Karlo Markso

**La kapitalo**

Kritiko de la politika ekonomio

Unua volumo

Libro I:

La produktadprocezo de la kapitalo

Karlo Markso

# La kapitalo

## Kritiko de la politika ekonomio

## Unua volumo

## Libro I:

## La produktadprocezo de la kapitalo

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso

La kapitalo

Volumo I
Kritiko de la politika ekonomio

Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

2-a, reviziita eldono (en 2015 nur reta en: http://marxists.org)

Monda Asembleo Socia (MAS)

2015

© Ĉiuj rajtoj de la Esperanta versio ĉe la Monda Asembleo Socia (MAS) 2015

ISBN 978-2-36960-010-7

*Mi dankas*

*Dirk Bindmann*

*pro lia kontrollegado kaj valoraj helpoj.*

*La tradukinto*

*Dediĉita*

*al mia neforgesebla amiko*

*la aŭdaca, fidela, nobla antaŭbatalanto de la proletaro*

*Wilhelm Wolff*

*nask. en Tarnau, la 21-an de junio 1809; mort. ekzile en Manĉestro la 9-an de majo1846*

[Karlo Markso]

# Enhavo


Karlo Markso: Antaŭparolo al la unua eldono.........................................15
Karlo Markso: Postparolo al la dua eldono.............................................19
Karlo Markso: Antaŭ- kaj post-parolo al la franca eldono.......................27
Frederiko Engelso: Pri la tria eldono......................................................29
Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la angla eldono.................................32
Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara eldono.................................36
UNUA LIBRO – La produktadprocezo de la kapitalo............................42
UNUA SEKCIO – Varo kaj mono..........................................................42
UNUA ĈAPITRO – La varo..........................................................42
1. La du faktoroj de la varo: uzvaloro kaj valoro (valorsubstanco, valorgrando)..........................................................................42
2. Duobla eco de la laboro prezentita en la varoj.....................................48
3. La valorformo aŭ interŝanĝvaloro......................................................53
A) Simpla, unuopa aŭ hazarda valorformo.................................................54
1. La du polusoj de la valoresprimo: relativa valorformo kaj ekvivalentformo..........................................................................54
2. La relativa valorformo..........................................................................55
a) Enteno de la relativa valorformo.....................................................55
b) Kvanta determineco de la relativa valorformo.................................58
3. La ekvivalentformo................................................................................60
4. La tutaĵo de la simpla valorformo........................................................65
B) Totala aŭ disvolvita valorformo..............................................................66
1. La disvolvita relativa valorformo..........................................................67
2. La aparta ekvivalentformo....................................................................68
3. Mankoj de la totala aŭ disvolvita valorformo.......................................68
C) Ĝenerala valorformo...............................................................................69
1. Ŝanĝita karaktero de la valorformo.......................................................69
2. Evolurilato de relativa valorformo kaj ekvivalentformo.......................71
3. Transiro el ĝenerala valorformo al monformo.......................................73
Ĉ) Monformo................................................................................................73
1.4. La fetiĉeco de la varo kaj ĝia sekreto...............................................74
DUA ĈAPITRO – La interŝanĝprocezo.......................................................86
TRIA ĈAPITRO – Mono kaj varcirkulado..................................................94
1.1. Mezuro de la valoroj............................................................................94
2. Cirkulilo.................................................................................................102
a) La metamorfozo de la varoj.................................................................102
b) La cirkulado de la mono......................................................................111
c) La monero. La valorsigno....................................................................120
3. Mono.....................................................................................................125
a) Trezorigo.............................................................................................125
b) Pagrimedo............................................................................................130
c) mondmono............................................................................................137
DUA SEKCIO – La transformado de mono en kapitalon......................141
KVARA ĈAPITRO – Transformado de mono en kapitalon.......................141
1. La ĝenerala formulo de la kapitalo.......................................................141
2. Kontraŭdiroj de la ĝenerala formulo.....................................................149
3. Aĉeto kaj vendo de la laborforto...........................................................159

TRIA SEKCIO – La produktado de la absoluta plusvaloro....................169
KVINA ĈAPITRO – Laborprocezo kaj plivalorigprocezo..........................169
1. Laborprocezo.......................................................................169
2. Plivalorigprocezo..................................................................177
SESA ĈAPITRO – Konstanta kapitalo kaj varia kapitalo...........................188
SEPA ĈAPITRO – La kvoto de la plusvaloro............................................199
1. La ekspluatkvoto de la laborforto......................................................199
2. Esprimo de la produktvaloro en proporciaj partoj de la sama produkto
.........................................................................................206
3. La „lasta horo” de Senior.................................................................209
4. La plusprodukto..............................................................................214
OKA ĈAPITRO – La labortago...............................................................215
1. La limoj de la labortago....................................................................215
2. La malsatego je pluslaboro. Fabrikisto kaj bojaro.............................218
3. Anglaj industribranĉoj sen leĝa limo de ekspluatado.........................227
4. Tag- kaj nokt-laboro. La alternadsistemo..........................................239
5. La batalo pri la normallabortago. Trudleĝoj por plilongigo de la labortago ekde la mezo de la 14-a ĝis fine de la 17-a jarcento...............246
6. La batalo pri norma labortago. Leĝa limigo de la labortempo. La angla fabrikleĝaro de 1833-1864................................................................258
7. La batalo pri la norma labortago. Retroefiko de la angla fabrikleĝaro sur aliaj landoj..........................................................................278
NAŬA ĈAPITRO – Kvoto kaj kvanto de la plusvaloro..............................284
KVARA SEKCIO – La produktado de la relativa plusvaloro................293
DEKA ĈAPITRO Nocio de la relativa plusvaloro......................................293
DEKUNUA ĈAPITRO Kunlaborado.........................................................301
DEKDUA ĈAPITRO Labordivido kaj manufakturo..................................315
1. Duobla origino de la manufakturo....................................................315
2. La partlaboristo kaj lia ilo...............................................................317
3. La du bazaj formoj de la manufakturo – heterogena manufakturo kaj organika manufakturo........................................................................320
4. Labordivido ene de la manufakturo kaj labordivido ene de la socio...328
5. La kapitalisma karaktero de la manufakturo......................................336
DEKTRIA ĈAPITRO: Maŝinaro kaj granda industrio................................346
1. Disvolvado de la maŝinaro...............................................................346
2. Valortransdono de la maŝinaro al la produkto...................................359
3. Tujaj efikoj de la maŝinsistemo sur la laboristo................................367
a) Alproprigo de kromaj laborfortoj fare de la kapitalo. Virin- kaj infan-laboro
.........................................................................................367
b) Longigo de la labortago...................................................................375
c) Intensigo de la laboro......................................................................381
4. La fabriko......................................................................................390
Engelso.........................................................................................396
5. Batalo inter laboristo kaj maŝino......................................................397
6. La kompensteorio koncerne la laboristojn anstataŭitajn de la maŝinoj

........................................................................................................409
7. Reĵeto kaj altiro de laboristoj kun evoluo de la maŝinsistemo. Krizoj de la kotonindustrio........................................................................417
8. Revoluciigo de manufakturo, metio kaj domlaboro per la granda industrio........................................................................................430
a) Detruado de la kunlaborado bazita sur metio kaj labordivido....................430
b) Reefiko de la fabriksistemo al manufakturo kaj domlaboro......................431
c) La moderna manufakturo..........................................................................432
ĉ) La moderna hejmlaboro.............................................................................435
d) Transiro de la moderna manufakturo kaj hejmlaboro al la granda industrio. Rapidigo de tiu revolucio per aplikado de la fabrikleĝoj al tiuj industrioj......439
9. Fabrikleĝaro (klaŭzoj pri sano kaj edukado). Ĝia ĝeneraligo en Anglio ........................................................................................................449
10. Granda industrio kaj kampkulturo..................................................471
Engelso...........................................................................................471
KVINA SEKCIO – La produktado de absoluta kaj relativa plusvaloro.474
DEKKVARA ĈAPITRO Absoluta kaj relativa plusvaloro..........................474
DEKKVINA ĈAPITRO Ŝanĝiĝo de grando de prezo de la laborforto kaj de la plusvaloro.............................................................................................484
I. Grando de la labortago kaj intenso de la laboro konstantaj (donitaj), produktadforto de la laboro varia.........................................................485
II. Labortago konstanta, produktadforto de la laboro konstanta, laborintenso varia.............................................................................488
III. Produktadforto kaj intenso de la laboro konstantaj, labortago varia. 489
IV. Samtempa variado de daŭro, produktadforto kaj intenso de la laboro ........................................................................................................491
DEKSESA ĈAPITRO Diversaj formuloj por la kvoto de la plusvaloro.......494
SESA SEKCIO La salajro.....................................................................498
DEKSEPA ĈAPITRO Transformo de valoro resp. prezo de la laborforto en salajron...............................................................................................498
DEKOKA ĈAPITRO La tempsalajro........................................................505
DEKNAŬA ĈAPITRO La pecsalajro........................................................512
DUDEKA ĈAPITRO Naciaj diferencoj de la salajroj................................520
Anderson.........................................................................................521
SEPA SEKCIO – La akumuladprocezo de la kapitalo...........................525
DUDEKUNUA ĈAPITRO – Simpla reproduktado...................................526
Sismondi..........................................................................................527
Mill, James.......................................................................................531
Mill, James.......................................................................................533
DUDEKDUA ĈAPITRO – Transformado de plusvaloro en kapitalon........539
1. Kapitalisma produktadprocezo sur etendita skalo. Ŝanĝo de la proprietleĝoj de la varproduktado en leĝojn de la kapitalisma alproprigo ........................................................................................................539
2. Erara interpreto de la reproduktado je etendita skalo flanke de la politika ekonomio......................................................................548

3. Divido de la plusvaloro en kapitalon kaj enspezon [revenue]. La abstinencteorio.....551
4. Cirkonstancoj, kiuj sendepende de la proporcia divido de la plusvaloro en kapitalon kaj enspezon determinas la amplekson de la akumulado: ekspluadgrado de la laborforto − produktadforto de la laboro − kreskanta diferenco inter aplikata kaj konsumata kapitalo − grando de la antaŭpagata kapitalo.....558
5. La tiel nomata laborfonduso.....568
DUDEKTRIA ĈAPITRO Parto 1-a (sekcioj 1 ĝis 4) − La ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado.....572
1. Kreskanta postulo je laborforto kun la akumulado, ĉe senŝanĝa konsisto de la kapitalo.....572
Montesquieu.....575
2. Relativa malpliiĝo de la varia kapitalo en la daŭrigo de la akumulado kaj de la ĝin akompananta koncentriĝo.....580
3. Progresanta produktado de relativa superloĝantaro aŭ de industria rezervarmeo.....588
Engelso.....588
4. Diversaj ekzistoformoj de la relativa superloĝantaro. La ĝenerala leĝo de kapitalisma akumulado.....600
DUDEKTRIA ĈAPITRO. PARTO II (SEKCIO 5 a ĝis c).....607
La ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado.....607
5. Ilustrado de la ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado.....607
a) Anglio de 1846 ĝis 1866.....607
b) La malbone pagataj tavoloj de la brita industria laborista klaso.....613
c) La migruloj.....622
d) Efiko de la krizoj sur la plej bone pagatan parton de la laborista klaso.....626
DUDEKTRIA ĈAPITRO. PARTO III (SEKCIO 5.e kaj f)
La ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado.....631
e) La brita terkultura proletaro.....631
1. Bedfordshire.....645
2. Berkshire.....645
3. Buckinghamshire.....646
4. Cambridgeshire.....647
5. Essex.....647
6. Herefordshire.....647
7. Huntingdonshire.....647
8. Lincolnshire.....648
9. Kent.....649
10. Northamptonshire.....649
11. Wiltshire.....649
12. Worcestershire.....650
f) Irlando.....655
DUDEKKVARA ĈAPITRO La tiel nomata origina akumulado.....671
1. La mistero de la origina akumulado.....671
1.2. Senproprietigo de la kamparanoj je la grundo.....674
3. Persekutaj leĝoj kontraŭ la senproprietigitoj ekde la fino de la 15-a

jarcento. Leĝo por malaltigo de la salajro....691
4. Genezo de la kapitalisma produktado....698
5. Retroefiko de la kampkultura revolucio al la industrio. Starigo de la interna merkato por la industria kapitalo....701
6. Genezo de la industriaj kapitalistoj....705
7. Historia tendenco de la kapitalisma akumulado....716
DUDEKKVINA ĈAPITRO La moderna koloniigteorio....719
Indekso de personaj nomoj....728
Listo de mallongigoj kaj simboloj uzataj en la libro....753
Postparolo de la tradukinto....754

# Karlo Markso: Antaŭparolo al la unua eldono

La verko, kies unuan volumon mi transdonas al la publiko, estas la daŭrigo de mia skribaĵo publikigita en 1859: „Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio”. Tiu longa paŭzo inter komenco kaj daŭrigo estas ŝuldata al longjara malsano kiu ree kaj ree interrompis mian laboron.

La enhavo de tiu pli frua skribaĵo estas resumita en la unua ĉapitro de tiu ĉi volumo. Tio okazis ne nur pro la kohero kaj kompleteco. La prezentado estas plibonigita. Tiom kiom iel permesis la faktoj, multaj el la antaŭe nur aluditaj punktoj estas ĉi tie pli detaligitaj, dum inverse tie detale pritraktitaj aferoj estas ĉi tie nur aluditaj. La ĉapitroj pri la historio de la valor- kaj mon-teorio estas ĉi tie kompreneble komplete preterlasitaj. Tamen la leginto de la antaŭa skribaĵo trovas en la notoj al la unua ĉapitro novajn fontojn pri la historio de tiu teorio.

Ĉia komenco malfacilas, kiel en ĉia scienco. La kompreno de la unua ĉapitro, nome de la paragrafo, kiu entenas la analizon de la varo, estos pro tio plej malfacila. Koncerne la analizon de la valorsubstanco kaj de la valorgrando, mi kiom eble plej popularigis ĝin.[1] La valorformo, kies fina formo estas la monformo, estas tre senenhava kaj simpla. Tamen la hommenso de pli ol 2.000 jaroj provis esplori ilin vane, dum aliflanke la analizo de multe pli enhavaj kaj komplikaj formoj sukcesis almenaŭ proksimume. Kial? Ĉar la finkreskinta korpo pristudeblas pli facile ol la korpa ĉelo. Ĉe la analizado de la ekonomiaj formoj krome ne povas servi mikroskopo nek ĥemiaj reakciiloj. La abstraktiga forto devas anstataŭi ambaŭ. Sed por la burĝa socio la varformo de la laborprodukto aŭ la valorformo de la varo estas la ekonomia ĉelformo. Al la neklerulo iliaj analizoj ŝajnas konsisti el nuraj subtilaĵoj. Efektive temas ĉe tio pri subtilaĵoj, sed nur tiaj kiaj troviĝas en la mikrologia anatomio.

---

1 Tio ŝajnis des pli necesa, ĉar eĉ la paragrafo de la skribaĵo de F. Lasalo kontraŭ Schulze-Delitzsch, en kiu li deklaras doni *„la spiritan esencon”* de mia prezentaĵo pri tiuj temoj, entenas gravajn miskomprenojn. Cetere, se F. Lasalo pruntis ĉiujn ĝeneralajn teoriajn frazojn de siaj ekonomiaj laboraĵoj, ekz-e pri la historia karaktero de la kapitalo, pri la kunteksto inter produktadkondiĉoj kaj produktadmaniero ktp ktp preskaŭ laŭvorte, ĝis la terminaro kreita de mi, el miaj verkoj, kaj tion sen fontindiko, tiu procedo estis verŝajne decidita pro propagandaj konsideroj. Kompreneble mi ne parolas pri liaj detalaj disvolvadoj kaj uzaplikoj, kun kiuj mi havas nenion por fari.

Karlo Markso: Antaŭparolo al la unua eldono

Kun escepto de la paragrafo pri la valorformo oni do ne povas akuzi tiun ĉi libron pro malfacila kompreneblo. Mi supozas kompreneble legantojn kiuj volas lerni ion novan, do ankaŭ mem pensi.

La fizikisto observas la naturprocezojn tie, kie ili aperas en la plej esenca formo kaj malplej nebuligitaj de ĝenaj influoj, aŭ, kie eblas, li faras eksperimentojn sub kondiĉoj kiuj certigas la puran sinsekvon de la procezoj. Kion mi devas esplori en tiu ĉi verko, estas la kapitalisma produktadmaniero kaj la produktad- kaj cirkulad-kondiĉoj. Ilia klasika loko estas ĝis nun Anglio. Jen la kialo pro kiu ĝi servas al la ĉefa ilustrado de mia teoria disvolvado. Sed se la germana leganto eble farisee suprentiras la ŝultrojn pri la kondiĉoj de la angla industri- kaj kamp-laboristo aŭ optimisme ĉe tio trankviliĝas ke en Germanio la aferoj ankoraŭ tute ne estas tiel malbonaj, tiam mi devas krii al li: *De te fabula narratur!* [Temas pri vi!]

Por si mem ne temas pri la pli alta aŭ pli malalta evolugrado de la sociaj antagonismoj, kiuj fontas el la naturleĝoj de la kapitalisma produktado. Temas pri tiuj leĝoj mem, pri tiuj tendencoj kiuj efikas kaj trudas sin kun fera nepreco. La industrie pli evoluinta lando montras al la malpli evoluinta nur la bildon de ties propra estonteco.

Sed sendepende de tio: Kie la kapitalisma produktado estas ĉe ni komplete enradikiĝinta, ekz-e en la realaj fabrikoj, tiuj kondiĉoj estas multe pli malbonaj ol en Anglio, ĉar la kontraŭpezo de la fabrikleĝoj mankas. En ĉiuj aliaj sferoj, kiel al la tuta cetera kontinenta Eŭropo, turmentas nin ne nur la evoluo de la kapitalisma produktado, sed ankaŭ la manko de ĝia evoluo. Apud la modernaj mizeroj premas nin tuta serio da hereditaj mizeroj, fontantaj el la pluvegetado de antikvaj, preterpasitaj produktadmanieroj, kun ilia sekvantaro de kontraŭtempaj sociaj kaj politikaj kondiĉoj. Ni suferas ne nur pro la vivantoj, sed ankaŭ pro la mortintoj. *Le mort saisit le vif!* [La mortinto kaptas la vivanton!]

Kompare kun la angla, la sociala statistiko de Germanio kaj de la cetera kontinenta Okcidenteŭropo estas mizera. Tamen ĝi levas la vualon ĝuste sufiĉe por antaŭsupozi malantaŭ ĝi kapon de Meduzo. Ni ektimus antaŭ niaj propraj kondiĉoj, se niaj registaroj kaj parlamentoj, kiel en Anglio, taskus periodajn esplorkomisionojn pri la ekonomiaj kondiĉoj, se tiuj komisionoj estus ekipitaj per la sama plenpotenco kiel en Anglio por esplori la veron, se oni sukcesus trovi por tio same kompetentajn, sen-partiajn kaj rigorajn homojn kiel estas la fabrikinspektistoj de Anglio, ĝiaj kuracistaj raportistoj pri „*Public Health*” (Publika Sano), ĝiaj esplor-

komisionanoj pri la ekspluatado de la virinoj kaj infanoj, pri loĝ- kaj nutrad-kondiĉoj ktp. Perseo bezonis nebulĉapon por persekuti monstrojn. Ni tiras la nebulĉapon profunde super okul' kaj orel', por povi fornei la ekzistadon de la monstroj.

Oni ne trompiĝu pri tio. Kiel la usona sendependecmilito de la 18-a jarcento sonorigis la ŝtormsonorilon por la eŭropa meza klaso, tiel la usona interna milito de la 19-a jarcento por la eŭropa laborista klaso. En Anglio la transformprocezo estas per la manoj palpebla. Je certa kulmino ĝi devas transsalti al la kontinento. Tie ĝi moviĝos en pli brutalaj aŭ pli humanaj formoj, laŭ la evolugrado de la laborista klaso mem. Sendepende de pli altaj motivoj, do ilia plej propra intereso ordonas nun al la regantaj klasoj la forigon de ĉiuj leĝe kontroleblaj malhelpoj kiuj obstaklas la evoluon de la laborista klaso. Pro tio mi dediĉis tiom detalan lokon en tiu ĉi volumo al i.a. la historio, la enhavo kaj la rezultoj de la angla fabrikleĝaro. Unu nacio povas kaj devas lerni de la alia. Eĉ kiam socio malkovris la naturleĝon de sia moviĝo – kaj estas la lasta fincelo de tiu ĉi verko senvualigi la ekonomian moviĝleĝon de la moderna socio –, ĝi povas naturajn evolufazojn nek transsalti nek fordekreti. Sed ĝi povas mallongigi kaj mildigi la naskiĝpenojn.

Vorton por eviti eblajn miskomprenojn. La figurojn de kapitalisto kaj terposedanto mi tute ne pentras roze. Sed temas ĉi tie pri la personoj nur laŭ la mezuro en kiu ili estas la personigo de ekonomiaj kategorioj, portantoj de certaj klasrilatoj kaj interesoj. Malpli ol ĉiu alia, mia vidpunkto, kiu komprenas la evoluon de la ekonomia socisistemo kiel naturhistorian procezon, povas respondecigi la unuopulon pri kondiĉoj kies kreitaĵo li socie restas, kiom ajn li subjektive povas leviĝi super ili.

Sur la kampo de la politika ekonomio la libera scienca esplorado renkontas ne nur la saman malamikon kiel sur ĉiuj aliaj kampoj. La aparta naturo de la afero kiun ĝi pritraktas alvokas kontraŭ ĝi al batalo la plej akrajn, plej etanimajn kaj plej malamajn pasiojn de la homa brusto, la furiojn de la privatintereso. La angla alta eklezio ekz-e pardonas pli facile la atakon al 38 el siaj 39 kredartikoloj ol al $^1/_{39}$ da ĝia monenspezo. Nuntempe eĉ la ateismo estas *culpa levis* [peko malgranda] kompare kun la kritiko de tradiciaj proprietrilatoj. Mi referencas ekz-e la libron aperintan en la lastaj semajnoj: „*Correspondence with Her Majesty's Missions Abroad, regarding Industrial Questions and Trades Unions*”. La eksteraj reprezentantoj de la angla krono elparolas ĉi tie per sekaj vortoj, ke en Germanio, Francio, mallonge en ĉiuj kulturŝtatoj de la eŭropa kontinento, transformiĝo de la ekzistantaj kondiĉoj de kapitalo kaj laboro estas

Karlo Markso: Antaŭparolo al la unua eldono

same sentebla kaj same neevitebla kiel en Anglio. Samtempe, aliflanke de la Atlantika Oceano s-ro Wade, vicprezidanto de Usono, deklaris en publikaj amaskunvenoj: Ke post forigo de la sklaveco la transformado de la kapital- kaj terposed-kondiĉoj eniros la tagordon! Tio estas signoj de la tempo kiuj ne kaŝeblas per purpuraj manteloj aŭ nigraj frokoj[2]. Ili ne signifas ke morgaŭ okazos mirakloj. Ili montras ke eĉ ĉe la regantaj klasoj ekflagras la antaŭsupozo ke la nuna socio ne estas firma kristalo, sed transformiĝkapabla organismo konstante transformiĝanta.

La dua libro de tiu ĉi verko pritraktos la cirkuladprocezon de la kapitalo (libro II) kaj la formojn de la tutaĵprocezo (libro III), la fina tria volumo (libro IV) la historion de la teorio.

Ĉia juĝo de scienca kritiko estas al mi bonvena. Kontraŭ la antaŭjuĝoj de la t.n publika opinio, al kiu mi faris neniam koncedojn, validas por mi daŭre la slogano de la granda florencano:

*Segui il tuo corso, e lascia dir le genti!*

Daŭrigu vian vojon, kaj lasu la homojn paroli!

*Londono*, la 25-an de julio 1867

*Karlo Markso*

2 Purpuraj manteloj estas la signo de nobeleco, nigraj frokoj de la klerikaro. -vl

# Karlo Markso: Postparolo al la dua eldono

La legintojn de la unua eldono mi devas unue informi pri la ŝanĝoj faritaj en la dua eldono. La pli klara aranĝo de la libro okulfrapas. Aldonaj notoj estas ĉie signitaj kiel notoj al la dua eldono. Rilate al la teksto mem la plej grava estas:

En ĉapitro I, 1 la derivado de la valoro per analizo de la ekvacioj, en kiuj esprimiĝas ĉia interŝanĝvaloro, estas farita science pli strikte, same la en la unua eldono nur aludita rilato inter la valorsubstanco kaj la difinado de la valorgrando per socie necesa labortempo estas eksplicite emfazita. La ĉapitro I,3 (La valorformo) estas komplete reverkita, kion neprigis jam la duobla prezentado de la unua eldono. –Preterpase mi rimarkigu, ke tiu duobla prezentado estis instigita de mia amiko, d-ro L. Kugelmann en Hanovro. Mi troviĝis vizite ĉe li en printempo de 1867, kiam la unuaj presprovaĵoj alvenis el Hamburgo, kaj li konvinkis min, ke por la plej multaj legantoj necesas kroma, pli didaktika klarigo de la valorformo. – La lasta paragrafo de la unua ĉapitro, „La fetiĉeco de la varo ktp” estas grandparte ŝanĝita. La ĉapitro III,1 (Mezuro de la valoroj) estas zorge reviziita, ĉar tiu parto en la unua eldono, kun referenco al la diskuto en la „Kritiko de la politika ekonomio”, Berlino 1859, estis neglekte pritraktita. La ĉapitro VII, aparte la parto 2, estas grave reverkita.

Estus senutile, detale pritrakti la kelklokajn, ofte nur stilajn, tekstŝanĝojn. Ili koncernas la tutan libron. Tamen mi trovas nun dum kontrollegado de la nun en Parizo aperanta franca traduko, ke kelkaj partoj de la germana originalo bezonintus ie pli rigoran reverkadon, tie pli grandan stilan korektadon aŭ pli zorgan forigon de kelkaj eraroj. Por tio mankis la tempo, ĉar mi ricevis nur en aŭtuno 1871, meze de aliaj urĝaj laboroj, la sciigon ke la libro estas elĉerpita, sed ke la presado de la dua eldono devas komenci jam en januaro 1872.

La kompreno, kiun trovis „La Kapitalo” rapide en larĝaj rondoj de la germana laborista klaso, estas la plej bona rekompenco de mia laboro. Viro, ekonomie sur la burĝa starpunkto, s-ro Mayer, viena fabrikisto, trafe klarigis en broŝuro aperigita dum la germana-franca milito, ke la granda teoria sento, kiu estis konsiderata germana heredaĵo, tute foriĝis ĉe la t.n. kleraj klasoj de Germanio, sed kontraŭe nove vigliĝas ĉe ĝia laborista klaso.

Karlo Markso: Postparolo al la dua eldono

La politika ekonomio restis en Germanio ĝis tiu ĉi studaĵo eksterlanda scienco. Gustav von Gülich, en sia „Historia prezentado de la komerco, de la metioj ktp", nome en la 1830 eldonitaj du unuaj volumoj de sia verko, jam pritraktis grandparte la historiajn cirkonstancojn kiuj malhelpis la disvolviĝon de la kapitalisma produktadmaniero ĉe ni, por tio ankaŭ la konstruadon de la moderna burĝa socio. Mankis do la viva grundo de la politika ekonomio. Ĝi estis importita kiel finita varo el Anglio kaj Francio; ĝiaj germanaj profesoroj restis lernantoj. La teoria esprimo de fremda realo transformiĝis sub ilia mano en kolektaĵon de dogmoj, interpretitaj de ili en la senco de la ilin ĉirkaŭanta etburĝa mondo, do misinterpretitaj. La ne tute subpremeblan senton de scienca senpoveco kaj la timigan konsciencon devi instrui pri efektive fremdeca kampo, oni provis kaŝi sub la pompo de literaturhistoria klereco aŭ per almiksado de fremdaj materialoj, pruntitaj el la t.n. kameraj sciencoj, miksaĵo de konoj, kies purgatorion la esperplena[1] kandidato de germana burokrateco devas sukcese elteni.

Ekde 1848 la kapitalisma produktado evoluis rapide en Germanio kaj nuntempe jam aperigas sian ŝajnfloron. Sed al niaj fakuloj la sorto restis same malfavora. Tiom longe kiom ili povis senpartie umi pri politika ekonomio, mankis la modernaj ekonomiaj kondiĉoj en la germana realeco. Ekde kiam tiuj kondiĉoj ekvivis, tio okazis en kondiĉoj kiuj jam ne permesas ilian senpartian studadon ene de la burĝa horizonto. Se ĝi estas burĝa, do komprenanta la kapitalisman ordon, anstataŭ historie preterpasantan evoluŝtupon, inverse kiel absolutan kaj lastan formon de la socia produktado, la politika ekonomio povas resti scienco nur tiom longe kiom la klasbatalo restas latenta aŭ montriĝas nur en unuopaj okazaĵoj.

Ni prenu Anglion. Ĝia klasika politika ekonomio okazas en la periodo de la neevoluinta klasbatalo. Ĝia lasta granda reprezentanto, Ricardo, fine faras konscia la kontraŭdiron de la klasinteresoj, de la laborsalajro kaj de la profito, de la profito kaj la grundrento, la tikla punkto de siaj esploradoj, per tio ke li komprenas tiun kontraŭdiron naive kiel socian naturleĝon. Sed per tio la burĝa scienco de ekonomio atingis sian netransigeblan baron. Ankoraŭ dum la vivtempo de Ricardo kaj kontraste al li la kritiko alpaŝis lin en la persono de Sismondi.[2]

La sekva periodo de 1820-1830 elstaras en Anglio per scienca vigleco surkampe de la politika ekonomio. Ĝi estis la periodo de vulgarigo kaj

1 *En la 3-a kaj 4-a eldono:* senespera.

2 Vd mian tekston „Kontribuaĵo al la kritiko ktp.", p. 39 [Vd Marx-Engels Werke [en la sekvo: MEW], vol. 1, p. 46].

disvastigo de la teorio de Ricardo, kiel de ĝia batalo kun la malnova skolo. Oni festis brilajn turnirojn. Kio estis tiam farita, estas malmulte konata al la eŭropa kontinento, ĉar la polemiko estas grandparte disa en revuaj artikoloj, okazaj skribaĵoj kaj pamfletoj. La senpartieco de tiu polemiko – kvankam la teorio de Ricardo servas esceptokaze ankaŭ jam kiel atak-armilo kontraŭ la burĝa scienco – klarigeblas el la tempaj cirkonstancoj. Unuflanke la granda industrio mem nur elpaŝis el sia infanaĝo, kio pruviĝas jam el tio ke ĝi nur per la krizo de 1825 komencis la periodan ciklon de sia moderna vivo. Aliflanke la klasbatalo inter kapitalo kaj laboro restis marĝenigita, politike per la disputo inter la registaroj kaj feŭduloj arigitaj ĉirkaŭ la Sankta Alianco kaj la popolamaso gvidata de la burĝaro, ekonomie per la disputo de la industrikapitalo kun la aristokratia grundproprieto, kiu en Francio kaŝiĝis malantaŭ la kontraŭdiro de parcela proprieto kaj grandproprieto, en Anglio ekde la grenleĝoj eksplodis malkaŝe. La literaturo de la politika ekonomio en Anglio memorigas dum tiu periodo pri la ekonomia ŝtormperiodo en Francio post la morto de d-ro Quesnay, sed nur kiel la postsomero memorigas pri la printempo. En la jaro 1830 komenciĝis la finfine decida krizo.

La burĝaro estis konkerinta en Francio kaj Anglio politikan potencon. Ekde tiam la klasbatalo alprenis, praktike kaj teorie, pli kaj pli eksplicitajn kaj minacajn formojn. Ĝi sonorigis la morttintilon de la scienca burĝa ekonomio. Nun jam ne temis pri tio, ĉu tiu aŭ alia teoremo estas vera, sed ĉu ĝi estas utila al la kapitalo aŭ malutila, komforta aŭ malkomforta, ĉu kontraŭa aŭ ne al la polico. La neprofitcelan esploradon anstataŭis pagata parolskermado, la senantaŭjuĝan sciencan esploradon anstataŭis la malbona konscienco kaj la malbona intenco de apologetiko. Tamen eĉ la trudiĝemaj traktaĵetoj kiujn ŝprucis en la mondon la *Anti-Corn-Law-League*, kun ĉekape la fabrikistoj Cobden kaj Bright, estis, se ne science, sed ja historie interesaj pro sia polemiko kontraŭ la grundposedanta aristokratio. Ankaŭ tiun lastan pikilon eltiris la liberkomerca leĝo ekde *Sir* Robert Peel al la vulgarekonomio.

La kontinenta revolucio de 1848 ankaŭ reefikis sur Anglion. Viroj kiuj ankoraŭ pretendis sciencan gravecon kaj volis esti pli ol nuraj sofistoj kaj sikofantoj de la regantaj klasoj, provis harmoniigi la ekonomion de la kapitalo kun la nun jam ne ignoreblaj postuloj de la proletaro. Pro tio senspirita sinkretismo, kian plej bone reprezentas John Stuart Mill. Ĝi estas bankrotdeklaro de la „burĝa” ekonomio, kiun la granda rusa klerulo kaj kritikisto N. Ĉerniŝevski jam majstre prilumis en sia verko „Konturoj

Karlo Markso: Postparolo al la dua eldono

de la politika ekonomio post Mill”.[3]

En Germanio la kapitalisma produktadmaniero do maturiĝis post kiam ĝia antagonismeco estis en Francio kaj Anglio per historiaj bataloj jam brue evidentiĝinta, dum la germana proletaro posedis jam multe pli decidan teorian klaskonscion ol la germana burĝaro. Ekde kiam burĝa scienco de politika ekonomio ĉi tie ŝajnis fariĝi ebla, ĝi pro tio jam fariĝis malebla.

En tiaj cirkonstancoj ĝiaj porparolantoj dividis sin en du vicojn. La unuaj, inteligentaj, profitemaj, praktikaj uloj, arigis sin ĉirkaŭ la flago de Bastiat, la plej plata kaj pro tio plej sukcesinta reprezentanto de la vulgar-ekonomia apologetiko; la aliaj, fieraj pri la profesora digno de sia scienco, sekvis al J. St. Mill en la provo pacigi nepacigeblon. Kiel en la klasika tempo de la burĝa ekonomio la germanoj restis ankaŭ tempe de ĝia kadukiĝo nuraj lernantoj, papagumantoj kaj postpaŝantoj, etkolportistoj de la eksterlanda grandkomerco.

La aparta historia evoluo de la germana socio do ekskludis ĉi tie ĉian originalan pludisvolvadon de la „burĝa” ekonomio, sed ne ties – kritikon. Se entute tia kritiko reprezentas klason, ĝi povas reprezenti nur klason kies historia metio estas la kompleta transformado de la kapitalisma produktadmaniero kaj la fina nuligo de la klasoj – la proletaro.

La kleraj kaj malkleraj porparolantoj de la germana burĝaro unue provis tute prisilenti „La Kapitalo”-n, kiel ili sukcesis pri miaj antaŭaj verkoj. Ekde kiam tiu taktiko jam ne korespondis al la tempaj kondiĉoj, ili skribis, sub la preteksto recenzi mian libron, instrukciojn „Por trankviligo de la burĝa konscio”, sed trovis en la laborista gazetaro – vidu ekz-e la eseojn de Joseph Dietzgen en la „Volksstaat” – superajn batalantojn, al kiuj ili ĝis hodiaŭ ŝuldas respondon.[4]

---

3 *En la germana:* Tschernyschewski: *„Umrisse der politischen Ökonomie nach Mill”*. -vl

4 La kaĉfaŭkaj deliruloj de la germana vulgarekonomio skoldas stilon kaj prezentadon de mia verko. Neniu povas prijuĝi la literaturajn mankojn de la „Kapitalo” pli severe ol mi mem. Tamen mi citu, por utilo kaj plaĉo de tiuj sinjoroj kaj de ilia publiko, ĉi tie anglan kaj rusan juĝojn. La „Saturday Review”, tute malamika al miaj opinioj, diris en sia anonco de la unua germana eldono: La prezentado *„donas ankaŭ al la plej sekaj ekonomiaj demandoj ĉarmon”*. La „Sankt-Peterburga Gazeto” rimarkigas en sia numero de la 20-a de aprilo 1872 i.a.: „La prezentado, escepte de malmultaj tro specialaj partoj, elstaras per facila kompreneblo, klareco kaj, malgraŭ la scienca alteco de la temo, nekutima vigleco. Tiurilate la aŭtoro … eĉ ne

Trafa rusa traduko de la „Kapitalo” aperis en la printempo 1872 en Peterburgo. La eldono de 3.000 ekzempleroj estas jam hodiaŭ preskaŭ elĉerpita. Jam 1871 s-ro N. Sieber, profesoro pri politika ekonomio ĉe la universitato de Kievo, en sia verko: „La teorio de D. Ricardo pri valoro kaj kapitalo ktp” pruvis mian teorion pri valoro, mono kaj kapitalo en ĝiaj ĉefaj trajtoj kiel necesan perfektigon de la instruo de Smith-Ricardo. Kio surprizas la okcidenteŭropanon ĉe legado de lia originala libro, estas la konsekvenca persisto pri la pure teoria starpunkto.

La metodo aplikata en la „Kapitalo” estas malmulte komprenita, kiel pruvas jam la inter si kontraŭdiraj opinioj pri ĝi.

Tiel la pariza „Revue Positiviste” riproĉas al mi, unuflanke, ke mi pritraktas la ekonomion metafizike, aliflanke – oni divenu! – ke mi limigas min al nur kritika dispartigo de la donitaĵo, anstataŭ preskribi receptojn (ĉu laŭ la maniero de Comte?) por la kuirejo de la estonteco. Kontraŭ la riproĉo de metafiziko, prof. Sieber rimarkigas:

> „Tie kie temas pri la proprasenca teorio, la metodo de Markso estas la dedukta metodo de la tuta angla skolo, kies mankoj kaj meritoj estas komunaj al la plej bonaj teoriaj ekonomikistoj.”

S-ro M. Block – „Les Théoriciens du Socialisme en Allemagne. Extrait du Journal des Économistes, juillet et août 1872” – malkovras ke mia metodo estas analiza, kaj diras i.a.:

> „Par cet ouvrage M. Marx se classe parmi les esprits analytiques les plus éminents.” [„Per tiu ĉi verko s-ro Markso vicigas sin inter la plej eminentaj analizaj pensistoj.”]

La germanaj recenzistoj kompreneble krias pri hegela sofistiko. La peterburga „Eŭropa Heroldo” en artikolo kiu pritraktas ekskluzive la metodon de la „Kapitalo” (maja numero 1872, p. 427-436), trovas mian esplormetodon strikte realisma. Ĝi diras:

> „Unuavide, se juĝi pri la ekstera formo de la prezentado, Markso estas la plej granda idealfilozofo, pli precize en la germana, do malbona senco de la vorto. Sed fakte li estas senfine pli realisto ol ĉiuj liaj antaŭuloj en la afero de ekonomia kritiko … Oni povas neniel nomi lin idealisto.”

Mi povas ne pli bone respondi al la sinjoro aŭtoro [I. I. Kaufmann] ol per kelkaj eltiraĵoj el lia propra recenzo, kiu krome povas interesi iujn de

malproksime similas al la plej multaj germanaj kleruloj, kiuj … verkas siajn librojn en tiom obskura kaj seka lingvaĵo ke al ordinaraj mortidevuloj pro tio krakiĝas la kapo.” Sed al la legantoj de la moderna german-naci-liberala profesora literaturo io tute alia krakas ol la kapo.

Karlo Markso: Postparolo al la dua eldono

miaj legantoj al kiuj la rusa originalo estas nealirebla.

Post citaĵo el mia antaŭparolo al la „Kritiko de la pol. ek.”, Berlino 1859, p. IV-VII [vidu MEW, vol. 13, p. 8-10], kie mi diskutis la materiisman bazon de mia metodo, la aŭtoro daŭrigas:

> „Por Markso gravas nur unu afero: trovi la leĝon de la fenomenoj pri kies esplorado li okupiĝas. Kaj al li gravas ne nur la leĝo kiu regas ilin, laŭ tio ke ili havas finan formon kaj staras en interrilato, kiel ĝi estas observata en donita tempoperiodo. Por li gravas ankoraŭ ĉefe la leĝo de ilia ŝanĝiĝo, de ilia evoluo, t.e. la transiro el unu formo en la alian, el unu ordo de interrilato en alian. Ekde kiam li malkovras tiun leĝon, li esploras detale la sekvojn per kiuj ĝi montriĝas en la socia vivo … Laŭ tio, Markso klopodas nur pri unu afero: per preciza scienca esplorado pruvi la neceson de certaj ordoj de la sociaj rilatoj kaj kiom eble plej senriproĉeble konstati la faktojn kiuj servas al li kiel elir- kaj apog-punktoj. Por tio tute sufiĉas, se li pruvas kun la neceso de la nuna ordo samtempe la neceson de alia ordo, en kiun la unua neeviteble devas transiri, tute indiferente ĉu la homoj tion kredas aŭ ne kredas, ĉu ili konscias pri tio aŭ ne konscias. Markso rigardas la socian moviĝon kiel naturhistorian procezon, kiun stiras leĝoj kiuj ne nur estas sendependaj de la volo, de la konscio kaj de la intenco de la homoj, sed pli ĝuste inverse determinas ilian volon, konscion kaj intencojn … Se la konscia elemento en la kulturhistorio ludas tiom subordigitan rolon, tiam estas memkompreneble ke la kritiko, kies temo estas la kulturo mem, malpli ol io ajn alia povas havi ian formon aŭ ian rezulton de la konscio kiel bazon. Tio signifas, ke ne la ideo, sed nur la ekstera aperaĵo povas servi al ĝi kiel elirpunkto. La kritiko limiĝos al la komparado kaj konfrontado de fakto ne kun la ideo, sed kun la alia fakto. Por ĝi gravas nur ke ambaŭ faktoj estu kiom eble plej precize esploritaj kaj konsistigas vere unu kontraŭ la alia diversajn evolumomentojn, sed antaŭ ĉio gravas ke estu esplorata ne malpli precize la serio de la ordoj, la sinsekvo kaj ligiteco en kiu aperas la evolumomentoj. Sed, oni diros, la ĝeneralaj leĝoj de la ekonomia vivo estas tute la samaj, tute indiferente ĉu oni aplikas ilin al estanteco aŭ estinteco. Ĝuste tion Markso neas. Laŭ li tiaj abstraktaj leĝoj ne ekzistas … Liaopinie ĉiu historia periodo posedas, male, siajn proprajn leĝojn … Ekde kiam la vivo transvivis donitan evoluperiodon, transiras el donita stadio en alian, ĝi komencas ankaŭ esti gvidata de aliaj leĝoj. Unuvorte, la ekonomia vivo donas al ni fenomenon analogan al la evoluhistorio sur aliaj kampoj de biologio … La malnovaj ekonomikistoj miskomprenis la naturon de ekonomiaj leĝoj, kiam ili komparis ilin kun la leĝoj de fiziko kaj ĥemio … Pli profunda analizo de la fenomenoj pruvis, ke sociaj organismoj distingiĝas inter si same profunde kiel plantaj aŭ bestaj organismoj … Jes, unu sama fenomeno obeas tute diversajn leĝojn sekve al la diversa ĉioma konstruaĵo de tiuj organismoj, de la diverseco de iliaj apartaj organoj, de la diferenco de la kondiĉoj en kiuj ili funkcias ktp. Markso neas ekz-e, ke la loĝantarleĝo estas la sama en ĉiuj tempoj kaj ĉiuj lokoj. Li asertas, male, ke ĉiu evoluŝtupo havas sian propran loĝantarleĝon … Kun la diversa evoluo de la produktadforto, la

> kondiĉoj kaj la ilin reguligantaj leĝoj ŝanĝiĝas. Per tio ke Markso metas al si la celon, el tiu vidpunkto esplori kaj klarigi la kapitalisman ekonomi-ordon, li formulas nur severe science la celon kiun devas havi ĉia preciza esplorado de la ekonomia vivo … La scienca valoro de tia esplorado kuŝas en la klarigo de la apartaj leĝoj kiuj reguligas estiĝon, ekzistadon, evoluon, morton de donita socia organismo kaj ĝian anstataŭigon per alia, pli alta. Kaj tiun valoron havas efektive la libro de Markso."

Per tio ke la aŭtoro priskribas tion, kion li nomas mian realan metodon, tiel trafe kaj, laŭ tio ke li konsideras mian personan aplikadon de ĝi, tiel favorema, kion alian li tiel priskribis ol la dialektikan metodon?

Tamen la prezentmaniero devas formale distingiĝi disde la esplormetodo. La esplorado devas alproprigi al si la materialon detale, analizi ĝiajn diversajn evoluformojn kaj eltrovi ties internan ligon. Nur post kiam tiu laboro estas plenumita, la reala moviĝo laŭ tio prezenteblas. Se tio sukcesas kaj se nun la vivo de la materialo respeguliĝas idee, tiam povas aspekti kvazaŭ temus pri apriora konstruaĵo.

Mia dialektika metodo estas fundamente ne nur malsama ol la hegela, sed ĝia rekta malo. Por Hegelo la pensado, kiun li sub la nomo de ideo eĉ transformas al memstara subjekto, estas la mondkreanto[5] de la realaĵo kiu siavice estas nur ĝia ekstera aperformo. Ĉe mi, inverse, la ideeco estas nenio alia ol la materieco transformita kaj tradukita en la homkapo.

La mistifikan flankon de la hegela dialektiko mi kritikis antaŭ preskaŭ 30 jaroj, en tempo kiam ĝi estis ankoraŭ laŭmoda. Sed ĝuste kiam mi ellaboris la unuan volumon de la „Kapitalo", la enuiga, pretendema kaj mezkvalita epigonaro, kiu en la klera Germanio estas nun la ĉefaj parolantoj, kapricis pritrakti Hegelon tiel kiel la brava Moses Mendelssohn tempe de Lesingo pritraktis Spinozon, nome kiel „mortan hundon". Pro tio mi deklaris min malkaŝe kiel disĉiplo de tiu granda pensisto kaj koketis ie kaj tie en la Kapitalo pri la valorteorio per la esprimmaniero propra al li. La mistifikado, kiun la dialektiko suferas en la manoj de Hegelo, tute ne malebligas ke li la unua prezentis ĝiajn ĝeneralajn moviĝformojn en kompleta kaj konscia maniero. Ĝi staras ĉe li sur la kapo. Oni devas renversi ĝin por malkovri la racian kernon en la mistika ŝelo.

En sia mistifika formo la dialektiko fariĝis germana modo, ĉar ĝi ŝajnis glorkroni la ekzistantaĵon. En sia racia formo ĝi agacas kaj abomenigas la burĝaron kaj ties doktrinajn porparolantojn, ĉar ĝi entenas en la pozitiva

5 *Originale:* der Demiurg [la demiurgo, t.e. mondkreanto]. -vl

Karlo Markso: Postparolo al la dua eldono

kompreno de la ekzistanto samtempe ankaŭ la komprenon de ties negado, de ties nepra pereo, komprenas ĉian estiĝintan formon en la fluo de la movado, do ankaŭ laŭ ĝia mortonta flanko, neniel impreseblas, kaj ĉar ĝi estas esence kritika kaj revolucia.

La kontraŭdira moviĝo de la kapitalisma socio plej frape senteblas al la praktika burĝo en la sortoŝanĝoj de la perioda ciklo, kiun trairas la moderna industrio, kaj en ties kulmino – la ĝenerala krizo. Ĝi estas ree almarŝanta, kvankam ankoraŭ en la antaŭstadioj, kaj per la ĉiuflankeco de ĝia scenejo kiel per la intenseco de sia efiko, eĉ al la bonŝanculoj de la nova sankta, prusgermana regno instruegos dialektikon.

*Londono*, la 24-an de januaro 1873

*Karlo Markso*

# Karlo Markso: Antaŭ- kaj post-parolo al la franca eldono

Londono, la 18-an de marto 1872

Al la civitano Maurice La Châtre

Estimata civitano!

Mi salutas vian ideon eldoni la tradukon de la „Kapitalo” en periodaj liveraĵoj. En tiu formo la verko estos pli facile alirebla al la laborista klaso, kaj tiu konsidero estas por mi pli grava ol ĉiuj aliaj.

Tio estas la antaŭo de la medalo, sed ĉi tie estas ankaŭ la dorsa flanko: La esplormetodo, kiun mi uzis kaj kiu ankoraŭ ne estis aplikita al ekonomiaj problemoj, sufiĉe malfaciligas la legadon de la unua ĉapitro, kaj estas timinde ke la franca publiko, ĉiam senpacienca pri la rezulto kaj avida ekkoni la rilaton inter la ĝeneralaj principoj kaj la demandoj kiuj instigas ĝin rekte, lasas sin fortimigi, ĉar ĝi ne povas tuj antaŭeniri pli.

Tio estas malavantaĝo, kontraŭ kiu mi povas nenion fari pli ol dekomence atentigi pri tio kaj pretigi la legantojn kiuj strebas al vero. Ne ekzistas ŝoseo por la scienco, kaj nur tiuj havas la perspektivon atingi la helajn altaĵojn, kiuj ne timas la penon surgrimpi ĝiajn krutajn padojn.

*Karlo Markso*

***Al la leganto***

S-ro J. Roy entreprenis doni kiom eble plej precizan kaj eĉ laŭvortan tradukon; li plenumis sian taskon skrupule precize. Sed ĝuste lia skrupula precizeco devigis min ŝanĝi la version, por fari ĝin por la leganto pli alirebla. Tiuj ŝanĝoj, faritaj de tago al tago, ĉar la libro aperis en liveraĵoj, estas faritaj kun malsama zorgemo kaj devis kaŭzi stilajn malsamecojn.

Post kiam mi komencis tiun laboron de reviziado, mi uzis ĝin por apliki ĝin ankaŭ al la baza originala teksto (la dua germana eldono), simpligi kelkajn diskutojn, kompletigi aliajn, aldoni kompletigan historian aŭ statistikan materialon, kritikajn rimarkojn ktp. Kia ajn estas la literaturaj

mankoj de tiu ĉi franca eldono, ĝi posedas sciencan valoron sendepende de la originalo kaj estu konsultata eĉ de legantoj kiuj regas la germanan lingvon.

Pli malsupre mi donas la lokojn de la postparolo al la dua germana eldono kiuj temas pri la evoluo de la politika ekonomio en Germanio kaj pri la metodo aplikita en tiu verko.

*Londono*, la 28-an de aprilo 1875

*Karlo Markso*

# Frederiko Engelso: Pri la tria eldono

La sorto ne volis ke Markso prespretigu mem tiun ĉi trian eldonon. La giganta pensanto, antaŭ kies grandeco iklinas sin nun ankaŭ la kontraŭuloj, mortis la 14-an de marto 1883.

Al mi, kiu perdis en li la kvardekjaran, plej bonan, plej fidelan amikon, la amikon al kiu mi dankas pli ol direblas per vortoj, al mi falis nun la devo prizorgi la eldonadon de tiu ĉi tria eldono kiel de la manskribe postlasita dua volumo. Kiel mi plenumis la unuan parton de tiu devo, pri tio mi ŝuldas ĉi tie raporton al la leganto.

Markso intencis komence, reverki grandparte la tekston de la unua volumo, pli precize formuli kelkajn teoriajn punktojn, aldoni novajn, kompletigi la historian kaj statistikan materialon ĝis la plej nova tempo. La stato de lia malsano kaj la dezirego alveni al finredaktado de la dua volumo, igis lin rezigni pri tio. Nur la plej necesa estu ŝanĝita, nur tiuj aldonoj estu enmetitaj kiujn jam entenis la intertempe aperinta franca eldono („Le Capital. Par Karl Marx", Paris, Lachâtre 1873).

En la postlasaĵo troviĝis do ankaŭ germana ekzemplero kiu estis de li kelkloke korektita kaj provizita per indikoj al la franca eldono; same franca, en kiu li markis la uzendajn teksterojn. Tiuj ŝanĝoj kaj aldonoj limiĝas, kun malmultaj esceptoj, al la lasta parto de la libro, la ĉapitro: La akumuladprocezo de la kapitalo. Ĉi tie la ĝisnuna teksto sekvis pli ol alie la originan koncepton, dum la antaŭaj ĉapitroj estis pli detale reverkitaj. La stilo estis pro tio pli vigla, pli saminspira, sed ankaŭ pli neglekta, spicita per anglismoj, kelkloke malklara; la evoluprocezo prezentis ie kaj tie breĉojn per tio ke kelkaj gravaj momentoj estis nur aluditaj.

Koncerne la stilon, Markso estis mem profunde ŝanĝinta plurajn subĉapitrojn kaj per tio, kiel en oftegaj buŝaj aludoj, doninta al mi la mezuron, kiom antaŭen mi rajtis iri en la forigo de anglaj teĥnikaj esprimoj kaj ceteraj anglismoj. La aldonojn kaj kompletigojn Markso estus ĉiukaze ankoraŭ reverkinta kaj la glatan francan anstataŭiginta per sia propra kompakta germana; mi devis kontentiĝi traduki ilin kun kiom eble plej bona kunigo kun la originala teksto.

Frederiko Engelso: Pri la tria eldono

Do en tiu ĉi tria eldono neniu vorto ŝanĝiĝis pri kiu mi ne certe sciis ke la aŭtoro mem ŝanĝintus ĝin. Mi ne povis kaprici enkonduki en la „Kapitalon” la kutiman ĵargonon, en kiu germanaj ekonomikistoj esprimas sin ĝenerale, tiun galimation, en kiu ekz-e tiu, kiu igas kontraŭ kontanta pago aliajn doni al li sian laboron, nomiĝas labor*donanto*, kaj labor*prenanto* tiu, kies laboro estas de li prenata kontraŭ salajro. Ankaŭ en la franca, *travail* en la ordinara vivo estas uzata en la senco de „okupiĝo”. Sed la francoj prave deklarus la ekonomikiston freneza kiu volus nomi la kapitaliston *donneur de travail* kaj la laboriston *receveur de travail*.

Same mi ne permesis al mi redukti la en la teksto ĝenerale uzatan anglan monon, mezuron kaj pezon al ĝiaj novgermanaj ekvivalentoj. Kiam la unua eldono aperis, en Germanio ekzistis tiom da specoj de mezuro kaj de pezo kiom tagoj en la jaro, krome duspeca marko (la Reichsmark [regna marko] validis tiam nur en la menso de Soetbeer, kiu inventis ĝin fine de la tridekaj jaroj), duspeca guldeno kaj almenaŭ tri specoj de taleroj, el kiuj unu, kies unuo estis la „nova dutriono”. En la naturscienco regis metraj, sur la mondmerkato anglaj mezuro kaj pezo. En tiaj kondiĉoj, anglaj mezurunuoj estis memkompreneblaj por libro kiu devis preni siajn faktajn pruvilojn preskaŭ ekskluzive el anglaj industriaj kondiĉoj. Kaj tiu lasta kialo restas ankoraŭ hodiaŭ decida, des pli ke la tiurilataj kondiĉoj en la mondmerkato apenaŭ ŝanĝiĝis kaj nome por la decidaj industrioj – fero kaj katuno – anglaj mezuro kaj pezo regas ankoraŭ hodiaŭ preskaŭ ekskluzive.

Fine ankoraŭ vorton pri la malmulte komprenata citmaniero de Markso. Ĉe pure faktaj indikoj kaj priskriboj la citaĵoj servas, ekz-e el la anglaj blulibroj, kompreneble kiel simplaj pruviloj. Sed alie tie, kie teoriaj opinioj de aliaj ekonomikistoj estas citataj. Ĉi tie la citaĵo devas nur indiki, kie, kiam kaj de kiu ekonomika opinio aperinta en la fluo de la evoluo estis unue klare eldirita. Ĉe tio gravas nur ke la koncerna ekonomia ideo havu signifon por la historio de la scienco, ke ĝi estas la pli aŭ malpli adekvata teoria esprimo de la ekonomia situacio de ĝia tempo. Sed ĉu tiu imago havas ankoraŭ absolutan aŭ relativan valoron por la starpunkto de la aŭtoro, aŭ ĉu ĝi jam tute apartenas nur al la historio, tio tute ne gravas ĉi tie. Tiuj citaĵoj konsistigas do nur komenton de la teksto, pruntitan el la historio de la ekonomia scienco, kaj konstatas la diversajn pli gravajn progresojn de la ekonomia teorio laŭ dato kaj aŭtoro. Kaj tio estis tre necesa en scienco, kies historiistoj ĝis nun elstaras nur per tendenca, preskaŭ strebanta nescio. – Oni nun ankaŭ komprenas, kial al Markso, kongrue kun la postparolo al la dua eldono, okazas nur tre

escepte citi germanajn ekonomikistojn.

La dua eldono povos espereble aperi dum la jaro 1884.

*Londono*, la 7-an de novembro 1883

*Frederiko Engelso*

# Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la angla eldono

La aperigo de angla eldono de la „Kapitalo” ne bezonas pravigon. Male, oni povas atendi klarigon kial tiu angla eldono estis ĝis nun prokrastita, se oni vidas ke de kelkaj jaroj la teorioj prezentitaj en tiu libro estis en la perioda gazetaro kaj taga literaturo de Anglio kiel de Usono konstante menciataj, atakataj kaj defendataj, klarigataj kaj misinterpretataj.

Kiam, baldaŭ post la morto de la aŭtoro en la jaro 1883, evidentiĝis ke angla eldono de la verko estis vere bezonata, s-ro Samuel Moore, longjara amiko de Markso kaj de la verkinto de tiuj ĉi linioj, kaj kun la libro mem eble pli familiara ol iu ajn, deklaris sin preta transpreni la tradukadon, pri kiu la literaturaj testament-plenumantoj estis urĝataj prezenti ĝin al la publiko. Estis interkonsentite ke mi komparu la manuskripton kun la originalo kaj proponu tiajn ŝanĝojn kiujn mi trovas konsilindaj. Kiam iom post iom montriĝis ke liaj profesiaj okupoj malhelpis s-ron Moore pretigi la tradukon tiom rapide kiom ĉiuj deziris, ni ĝoje akceptis la proponon de d-ro Aveling transpreni parton de la laboro; samtempe proponis sin s-ino Aveling, la plej juna filino de Markso, kontroli la citaĵojn kaj restarigi la originalan tekston de la multaj teksteroj prenitaj el anglaj aŭtoroj kaj blulibroj kaj tradukitaj de Markso al la germana. Tio estas ĉie farita kun kelkaj neeviteblaj esceptoj.

La sekvaj partoj de la libro estas tradukitaj de d-ro Aveling: 1. La ĉapitroj X (La labortago) kaj XI (Kvoto kaj maso de la plusvaloro); 2. la parto VI (La salajro, entenanta la ĉapitrojn XIX ĝis XXII); 3. de ĉapitro XXIV, parto 4 (Cirkonstancoj, kiuj ktp) ĝis la fino de la libro, entenanta la lastan parton de la ĉapitro XXIV, ĉapitron XXV kaj la tutan parton VIII (la ĉapitrojn XXVI ĝis XXXIII); 4. la du antaŭparoloj de la aŭtoro. La cetera parto de la libro estas tradukita de s-ro Moore. Dum tiel ĉiu tradukisto respondecas sole pri sia parto de la laboro, mi portas la respondecon pri la kompleta tutaĵo.

La tria germana eldono, kiun ni prenis ĝenerale kiel bazon de nia laboro, estis pretigita de mi en 1883 helpe de la notoj postlasitaj de la aŭtoro, kiuj indikas tiujn teksterojn kiuj estis anstataŭigotaj per la indikitaj teksteroj de la franca teksto publikigita en 1873.[1] La tiel en la teksto de la dua

1 „Le Capital. Par Karl Marx”, Traduko de s-ro J. Roy, komplete reviziita de la

eldono okazintaj ŝanĝoj kongruis ĝenerale kun la ŝanĝoj kiujn Markso preskribis en serio da manskribaj instrukcioj por angla eldono, kiu estis planita antaŭ dek jaroj en Usono, sed rezignita ĉefe pro manko de aktiva kaj taŭga tradukisto. Tiu manuskripto estis disponigita al ni de nia malnova amiko, s-ro F. A. Sorge en Hoboken, N[ew] J[ersey]. Ĝi indikas ankoraŭ pliajn enmetojn el la franca eldono; sed ĉar ĝi estas je tiom da jaroj pli malnova ol la lastaj indikoj por la tria eldono, mi ne konsideris min rajtigita uzi ilin alie ol escepte kaj en apartaj kazoj, per kio ĝi helpis nin superi malfacilaĵojn. Same la franca teksto estis konsultita ĉe la plej multaj malfacilaj teksteroj kiel indiko pri tio kion la aŭtoro mem pretis oferi, ĉie kie io de la tuta signifo de la originalo estis oferenda en la traduko.

Tamen ekzistas malfacilaĵo kiun ni ne povis ŝpari al la leganto: la uzado de certaj esprimoj en senco malsama ne nur de la lingvouzo de la ĉiutaga vivo, sed ankaŭ de la kutima politika ekonomio. Sed tio estis neevitebla. Ĉiu nova koncepto de scienco inkludas revolucion en la fakesprimoj de tiu scienco. Tion pruvas plej bone la ĥemio, en kiu la tuta terminaro proksimume ĉiujn dudek jarojn estas radikale ŝanĝita kaj kie oni trovas apenaŭ unu organikan kombinaĵon kiu ne traspertis tutan serion da diversaj nomoj. La politika ekonomio ĝenerale kontentiĝis transpreni la esprimojn de la komerca kaj industria vivo tiaj kiaj ili estis, kaj uzi ilin, ĉe kio ĝi komplete pretervidis ke ĝi per tio limiĝis al la strikta rondo de la ideoj esprimataj de tiuj vortoj. Tiel eĉ la klasika politika ekonomio, kvankam ĝi estis komplete konscia ke profito kiel rento estas nur subfakoj, pecoj de tiu nepagata parto de la produkto kiun la laboristo devas liveri al sia entreprenisto (ties unua alpropriganto, tamen ne lasta, ekskluziva posedanto), sed neniam transiris la kutimajn nociojn de profito kaj rento, ĝi neniam esploris tiun nepagatan parton de la produkto (de Markso nomata plusprodukto) en ĝia tuteco kiel tutaĵon, kaj pro tio neniam atingis klaran komprenon nek de ĝia origino kaj naturo, nek de la leĝoj kiuj reguligas la postan disdonadon de ĝia valoro. Simile ĉia industrio, escepte de terkulturado kaj metio, estas sendistinge kunmetita en la esprimo manufakturo kaj per tio la distingo inter du grandaj kaj esence diversaj periodoj de la ekonomia historio estingita: la periodo de la propradira manufakturo, kiu baziĝas sur la divido de la manlaboro, kaj la periodo de la moderna industrio, kiu baziĝas sur maŝinaro. Estas tamen memkomprenebla ke teorio, kiu rigardas la modernan kapitalisman

aŭtoro, Parizo, Lachâtre. Tiu traduko entenas aparte en la lasta parto de la libro konsiderindajn ŝanĝojn kaj kompletigojn al la teksto de la dua germana eldono.

produktadon kiel nuran evoluŝtupon de la ekonomia historio de la homaro, devas uzi aliajn esprimojn ol tiujn kutimajn al tiuj verkistoj kiuj konsideras tiun produktadmanieron kiel nepereeblan kaj definitivan.

Citi vorton pri la metodo de la aŭtoro eble ne maltaŭgus. En la plej multaj kazoj la citaĵoj servas en la kutima maniero kiel dokumentaj pruviloj por la asertoj faritaj en la teksto. Sed en multaj okazoj teksteroj el ekonomikaj verkintoj citiĝas por montri, kiam, kie kaj de kiu certa opinio estis unuafoje klare eldirita. Tio okazis en tiaj okazoj kie la citita opinio gravas kiel pli aŭ malpli taŭga esprimo de en certa tempo superregaj kondiĉoj de la socia produktado kaj de la interŝanĝo, kaj tute sendepende de tio ĉu Markso agnoskas ilin aŭ ĉu ili estas ĝenerale validaj. Tiuj citaĵoj provizas do la tekston per konstanta komento pruntita el la historio de la scienco.

Nia traduko entenas nur la unuan libron de la verko. Sed tiu unua libro estas en alta mezuro tutaĵo en si mem kaj estis dum dudek jaroj konsiderata kiel memstara verko. La dua libro, kiun mi eldonis 1885 germanlingve, estas decide nekompleta sen la tria, kiu ne publikigeblos antaŭ la fino de 1887. Kiam la libro III eldoniĝis en la germana originalo, tiam estos sufiĉe frue por pensi pri preparo de angla eldono de ambaŭ.

„La kapitalo” estas sur la kontinento ofte nomata „la biblio de la laborista klaso”. Ke la en tiu ĉi verko rikoltitaj konkludoj fariĝas ĉiutage pli kaj pli fundamentaj principoj de la granda movado de la laborista klaso, ne nur en Germanio kaj Svislando, sed ankaŭ en Francio, en Holando kaj Belgio, en Usono kaj eĉ en Italio kaj Hispanio; ke ĉie la laborista klaso en tiuj konkludoj agnoskas pli kaj pli la plej taŭgan esprimon de sia kondiĉo kaj de siaj aspiroj, tion neniu neos kiu estas intima kun tiu movado. Kaj ankaŭ en Anglio la teorioj de Markso faras potencan influon sur la socialisma movado, kiu disvastiĝas en la vicoj de la „kleruloj” ne malpli ol en la vicoj de la laborista klaso. Sed tio ne estas ĉio. La tempo rapide alproksimiĝas, kiam trudiĝos ĝisfunda esplorado de la ekonomia situacio de Anglio kiel nerezistebla nacia neceso. La irado de la industria sistemo de Anglio, kiu maleblas sen konstanta kaj rapida etendiĝo de la produktado kaj pro tio de la merkatoj, ekhaltis. La liberkomerco elĉerpis siajn helprimedojn; eĉ Manĉestro dubas pri tiu sia iama ekonomia evangelio.[2]

2 Dum la kvaronjarkunveno de la komerca ĉambro de Manĉestro, kiu plenumiĝis ĉi-posttagmeze, okazis vigla diskuto pri la demando de liberkomerco. Oni faris rezolucion en la senco ke „oni dum 40 jaroj vane atendis ke aliaj nacioj sekvu la ekzemplon donitan de Anglio, kaj ke la ĉambro konsideras nun la tempon veninta por ŝanĝi tiun starpunkton”. Tiu rezolucio estis rifuzita

La rapide evoluanta eksterlanda industrio alfrontas la anglan produktadon ĉie, ne nur en doganprotektitaj, sed ankaŭ en neŭtralaj merkatoj kaj eĉ ĉiflanke de la [Manika] Kanalo. Dum la produktiva forto kreskas laŭ geometria serio, la etendiĝo de la merkatoj progresas en la plej bona okazo laŭ aritmetika serio. La dekjara ciklo de stagnado, prospero, superproduktado kaj krizo, kiu de 1825 ĝis 1867 ĉiam revenis, ŝajnas tamen ĉesinta; sed nur por lasi nin alveni en la marĉon de malespero de konstanta kaj kronika depresio. La sopirata periodo de prospero ne volas veni; ĉiam kiam ni kredas vidi la simptomojn kiuj anoncas ĝin, tiam ili ree malaperas en la aero. Intertempe ĉiu nova vintro starigas ree la demandon: „kion fari kun la senlaboruloj?" Sed dum la nombro da senlaboruloj ŝvelas de jaro al jaro, neniu ekzistas por respondi tiun demandon; kaj ni povas preskaŭ kalkuli la momenton en kiu la senlaboruloj perdos la paciencon kaj prenos sian sorton en la proprajn manojn. En tia momento certe aŭdiĝu la voĉo de homo kies tuta teorio estas la rezulto de vivlonga studado de la ekonomia historio kaj situacio de Anglio kaj kiun tiu stagnado kondukis al la konkludo ke, almenaŭ en Eŭropo, Anglio estas la sola lando kie la neevitebla socia revolucio fareblus tute per pacaj kaj laŭleĝaj rimedoj. Certe li neniam forgesis aldoni ke li ne vere atendas ke la regantaj klasoj de Anglio sen „proslavery rebellion" submetiĝus al tia paca kaj laŭleĝa revolucio.

La 5-an de novembro 1996

*Frederiko Engelso*

per nur unu voĉo da plimulto, kun voĉ-proporcio de 21 por kaj 22 kontraŭ. (Evening Standard, 1-a de novembro 1886.)

# Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara eldono

La kvara eldono postulis de mi kiom eble plej definitivan fiksadon de la teksto kaj de la notoj. Kiel mi plenumis tiun postulon, pri tio mallonge la jenon.

Post refoja komparado de la franca eldono kaj de la manskribaj notoj de Markso mi enmetis ankoraŭ kelkajn aldonaĵojn. Ili troviĝas sur p. 80 (tria eldono, p. 88), p. 458-460 (tria eld., p. 509-510), p. 547-551 (tria eld., p. 600), p. 591-593 (tria eld., p. 644) kaj p. 596 (tria eld., p. 648) en la noto 79. [Vidu en tiu ĉi volumo, p. 130, 517-519, 610-613, 655-657, 660][1] Same mi enmetis en la tekston laŭ la antaŭaj franca kaj angla eldono la longan noton pri la minejlaboristoj (tria eld., p. 509-515) (kvara eld., p. 461-467) [Vidu en tiu ĉi volumo, p. 519-525]. Ceteraj malgrandaj ŝanĝoj estas pure teĥnikaj.

Krome mi faris ankoraŭ kelkajn klarigajn aldonajn notojn, nome tie, kie ŝanĝiĝintaj historiaj cirkonstancoj ŝajnis tion postuli. Ĉiuj ĉi aldonaj notoj estas metitaj inter rektaj krampoj kaj signitaj per miaj komencliteroj aŭ per „D. H.” [En tiu ĉi volumo per kunigaj krampoj { } kaj F. E.]

Kompleta reviziado de la multaj citaĵoj fariĝis necesa pro la intertempe aperinta angla eldono. Por tiu la plej juna filino de Markso, Eleanor, klopodis por kompari ĉiujn cititajn erojn kun la originaloj, tiel ke en la granda plimulto de la citaĵoj el anglaj fontoj aperas ne retraduko el la germana, sed la angla originala teksto mem. Estis do mia tasko konsulti tiun tekston ĉe la kvara eldono. Ĉe tio troviĝis kelkaj malgrandaj malprecizaĵoj. Referencoj al neĝustaj paĝnombroj, parte ĉe kopiado el la kajeroj misskribitaj, parte en la sekvo de tri eldonoj amasiĝintaj preseraroj. Malĝuste metitaj citiloj aŭ tripunktoj, kiel okazas neeviteble ĉe amasa citado el eltiraĵ-kajeroj. Ie kaj tie malpli bone elektita tradukvorto. Kelkaj teksteroj cititaj el la malnovaj parizaj kajeroj 1843-1845, kiam Markso ankoraŭ ne komprenis la anglan kaj legis anglajn ekonomikistojn en franca traduko; kie al la duobla tradukado respondis iometa ŝanĝo de la sonnuanco, ekz-e ĉe Steuart, Ure k.a. – kie nun uzendis la angla teksto. Kaj similaj malgrandaj malprecizaĵoj kaj neglektaĵoj. Se oni nun komparas la kvaran eldonon kun la antaŭa, tiam oni konvinkiĝas ke la tuta peniga korektoprocezo ŝanĝis ĉe la libro eĉ ne la plej etan menciindan eron. Nur unu sola citaĵo ne troveblis, tiu el Richard Jones (4-a eld., p. 562, noto 47)

---

1 Tiuj paĝindikoj ne kongruas kun tiu ĉi Esperanta eldono. -vl

[vidu en tiu ĉi volumo, p. 625]; Markso verŝajne misskribis la titolon de la libro. Ĉiuj aliaj konservas sian plenan pruvforton aŭ fortigas ĝin en la nuna preciza formo.

Sed ĉi tie mi estas devigata reveni al malnova historio.

Mi konas nur unu solan kazon ĉe kiu la ĝusteco de marksa citaĵo estis pridubita. Sed ĉar tiu daŭris ĝis post la morto de Markso, mi ne povas ĉi tie bone ignori.

En la berlina „Concordia", la organo de la germana fabrikistoligo, aperis la 7-an de marto 1872 anonima artikolo: „Kiel Karlo Markso citas". Tie oni asertis per superriĉa elspezo de morala indigno kaj per neparlamentecaj esprimoj, ke la citaĵo el la buĝet-parolado de Gladstone de la 16-a de aprilo 1863 (en la Mesaĝo de la Internacia Laborist-Asocio de 1864 [MEW, vol. 16, p. 3-13] kaj ripete en la „Kapitalo", I, p. 617, kvara eld., paĝo 670-671, tria eld. [vidu en tiu ĉi volumo, p. 680-681]) estas falsita. La frazo: „Tiu ebriiga pliiĝo de riĉaĵo kaj potenco … estas tute limigita al la posedantaj klasoj", staras per nenia vorto en la (kvazaŭoficiala) stenografia raporto de Hansard. „Sed tiu frazo troviĝas nenie en la parolado de Gladstone. Ĝuste la malo estas en ĝi dirita." (Per grasliteroj) **„Markso formale kaj materiale almensogis tiun frazon!"**

Markso, al kiu oni sendis tiun numeron de la „Concordia" en la sekva majo, respondis al la anonimulo en la „Volksstaat" de la 1-a de junio. Ĉar li jam ne memoris laŭ kiu gazetraporto li citis, li limigis sin pruvi la samtekstan citaĵon unue en du anglaj verkoj, kaj poste citi la raporton de la „Times", laŭ kiu Gladstone diras:

> „That is the state of the case as regards the wealth of this country. I must say for one, I should look almost with apprehension and with pain upon this intoxicating augmentation of wealth and power, if it were my belief that it was confined to classes who are in easy circumstances. This takes no cognizance at all of the condition of the labouring population. The augmentation I have described and which is founded, I think, upon accurate returns, is an augmentation entirely confined to classes of property."
>
> [„Tiel statas kun la riĉaĵo de tiu ĉi lando. Mi persone rigardus preskaŭ kun zorgo kaj kun sufero sur tiu ebriiga pliigo de riĉaĵo kaj potenco, se mi kredus ĝin limigita al la bonstataj klasoj. Ĉi tie oni tute ne priatentis la laborantan loĝantaron. La pliigo, kiun mi priskribis, estas tute limigita al la proprietaj klasoj."]

Do Gladstone diras ĉi tie, ke li bedaŭrus se estus tiel, sed ke *estas* tiel: Tiu ebriiga pliigo de potenco kaj de riĉaĵo *estas* tute limigita al la posed-

antaj klasoj. Kaj koncerne la kvazaŭoficialan Hansard, Markso diras plue: *„En sia ĉi tie postfakte fuŝita eldono s-ro Gladstone estis sufiĉe inteligenta forfuŝi la teksteron kiu el la buŝo de angla ĉefo de la ŝtata trezorejo ja estas kompromita. Tio estas cetere tradicia angla parlamenta kutimo, kaj tute ne inventaĵo de Laskerchen kontraŭ Bebelo."*

La anonimulo fariĝas ĉiam pli kolera. Kun la duamanaj fontoj en sia respondo, flanken ŝovante la „Concordia" de la 4-a de julio, li honteme indikas, ke estas „kutimo" citi parlament-paroladojn laŭ la stenografia raporto; sed ankaŭ la raporto de la „Times" (en kiu staras la „almensogita" frazo) kaj tiu de Hansard (en kiu ĝi mankas) „materie tute kongruas", kaj same la „Times"-raporto enhavas „la rektan malon de tiu fifama tekstero de la mesaĝo", ĉe kio tiu homo zorge prisilentas, ke ĝi apud tiu laŭaserta „malo" ĝuste entenas eksplicite „tiun fifaman teksteron"! Malgraŭ ĉio la anonimulo sentas ke li estas blokita kaj ke nur nova ruzaĵo povas savi lin. Dum li do, kiel ĵus pruvite, provizas sian artikolon per edifaj insultoj, kiel „mala fides", „malhonesteco", „mensoga indiko", „tiu mensoga citaĵo", „impertinenta mensogemo", „citaĵo kiu estis komplete falsita", „tiu falsaĵo", „simple abomena", ktp, li juĝas necese transigi la disputaĵon al alia kampo, kaj do promesas „en dua artikolo detale klarigi, kian gravecon ni" (la ne „mensogema" anonimulo) „atribuas al la vortoj de Gladstone". Kvazaŭ tiu lia modesta opinio havus la plej etan rilaton kun la afero! Tiu dua artikolo staras en la „Concordia" de la 11-a de julio.

Markso respondis refoje en la „Volksstaat" de la 7-a de aŭgusto, per tio ke li nun alportis ankaŭ la raportojn de la koncerna tekstero el la „Morning Star" kaj el la „Morning Advertiser" de la 17-a de aprilo 1863. Laŭ ambaŭ, Gladstone diras, ke li rigardus kun zorgo ktp al tiu ebriiga pliigo de riĉaĵo kaj de potenco, se li kredus ilin limigitaj al la vere bonstataj klasoj (classes in easy circumstances). Sed ke tiu pliigo *estas* limigita al klasoj kiuj posedas proprieton (entirely confined to classes possessed of property). Do ankaŭ tiuj raportoj citas la laŭdire „almensogitan" frazon laŭvorte. Krome li refoje konstatis, per komparado de la tesktoj de la „Times" kaj de Hansard, ke la en tri sekvamatene aperintaj, inter si sendependaj, samtekstaj gazetraportoj kiel vere elparolita konstatita frazo mankas en la laŭ konata „kutimo" reviziita raporto de Hansard, ke Gladstone, laŭ la vortoj de Markso, „postfakte" „forŝtelis" ĝin, kaj fine deklaris ke li ne havas la tempon por plu komuniki kun la anonimulo. Ŝajnas ke tiu ankaŭ tediĝis, almenaŭ Markso ne ricevis pliajn alsenditajn numerojn de la „Concordia".

Per tio la afero ŝajnis morta kaj enterigita. Tamen alvenis al ni de homoj, kiuj rilatis kun la kambriĝa universitato, misteraj onidiroj pri nedirebla literatura krimo kiun Markso laŭdire faris en la „Kapitalo”; sed malgraŭ ĉiaj priesploradoj absolute ne eblis ekscii ion pli precizan. Jen, la 29-an de novembro 1883, ok monatojn post la morto de Markso, aperis en la „Times” letero datita de Trinity College, Kambriĝo, kaj subskribita de Sedley Taylor, en kiu tiu viro per senmotiva okazo kaj ŝajnigante plej mildan kamaradecon fine ebligis al ni klariĝi, ne nur pri la onidiroj de Kambriĝo, sed ankaŭ pri la anonimulo de la „Concordia”.

> „Kio ŝajnas ekstreme strange, *diras la vireto de la Trinity College*, estas ke nur la *Profesoro Brentano (tiam en Breslaŭo, nun en Strasburgo)* … povis malkaŝi la mala fides, kiu evidente diktis la citaĵon el la parolado de Gladstone en la mesaĝo. S-ro Karlo Markso, kiu … provis defendi la citaĵon, havis la aŭdacon, en la agoniaj kramfoj *(deadly shifts),* en kiujn la majstre faritaj atakoj de Brentano plej rapide kondukis lin, aserti ke s-ro Gladstone fuŝriparis la raporton de sia parolado en la 'Times' de la 17-a de aprilo 1863, antaŭ ol ĝi aperis en Hansard, por forfuŝi teksteron kiu ja estus kompromita por angla ĉefo de la ŝtata trezorejo. Kiam Brentano, per detala tekstkomparo, pruvis ke la raportoj de la 'Times' kaj de Hansard kongruis en absoluta ekskludo de la senco, kiun ruze izolita citaĵo imputis al la vortoj de Gladstone, tiam Markso retiriĝis sub la preteksto de tempomanko!”

Jen do la klarigo! Kaj tiom glore reflektiĝas en la produktkooperativa fantazio de Kambriĝo la anonima kampanjo de s-ro Brentano en la „Concordia”! Tiel li kuŝis, kaj tiel li uzis sian spadon, en „majstre farita atako”, tiu Sankta Georgo de la germana fabrikisto-ligo, dum la inferdrako Markso agonias antaŭ liaj piedoj „plej rapide en agoniaj kramfoj”!

Tamen tiu tuta ariosteca batalpriskribo servas nur por kaŝi la ruzaĵojn de nia Sankta Georgo. Ĉi tie jam ne temas pri „almensogi”, pri „falsado”, sed pri „ruze izolita citaĵo” (craftily islated quotation). La tuta demando estis deŝovita, kaj Sankta Georgo kaj lia kambriĝa ŝildisto sciis tre bone kial.

Eleanor Markso respondis, ĉar la 'Times' rifuzis la akcepton, en la monata revuo 'To-Day', februaro 1884, reduktante la debaton al la sola punkto pri kiu estis teminta: Ĉu Markso „almensogis” tiun frazon aŭ ne? Al tio respondas s-ro Sedley Taylor:

> „La demando, ĉu certa frazo en la parolado de s-ro Gladstone aperis aŭ ne, *estas laŭ lia opinio* de tre subordigita graveco *en la disputo inter Markso kaj Brentano*, kompare kun la demando, ĉu la citaĵo estis farita kun la intenco redoni la sencon de Gladstone aŭ falsi ĝin”.

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara eldono

Kaj poste li koncedas, ke la 'Times'-raporto „efektive entenas kontraŭdiron en la vortoj”; sed, sed, kun la cetera kunteksto ĝuste, t.e. en la liberal-gladstonea senco klarigite, indikas, kion s-ro Gladstone *volis* diri. ('To-Day', marto 1884.) La plej komika afero ĉe tio estas ke nia vireto de Kambriĝo nun insistas citi la paroladon ne laŭ Hansard, kiel estas la „kutimo” laŭ la anonima Brentano, sed laŭ la raporto de la 'Times', kiun la sama Brentano kvalifikis „nepre fuŝa”. Kompreneble, la fatala frazo ja *mankas* en la Hansard!

Por Elenanor Marx estis facile forvaporigi tiun argumentadon. Aŭ s-ro Taylor legis la disputon de 1872. Tiam li nun „mensogis”, ne nur „al-”, sed ankaŭ „for-”. Aŭ li ne legis ĝin. Tiam li estis devigata fermi la buŝon. Ĉiukaze estis fakto ke li eĉ ne momenton kuraĝis daŭrigi la akuzon de sia amiko Brentano, ke Markso estis „almensoginta”. Male, Markso laŭ li nun ne almensogis, sed prisilentis gravan frazon. Sed tiu sama frazo estas citita en p. 5 de la mesaĝo, malmultajn liniojn antaŭ la laŭdire „almensogita”. Kaj koncerne la „kontraŭdiron” en la parolado de Gladstone, ĉu ne estas ĝuste Markso, kiu en la „Kapitalo”, p. 618 (3-a eld., p. 672), noto 105 [vidu en tiu ĉi volumo, p. 682] parolas pri la „kontinuaj, kriantaj kontraŭdiroj en la buĝetparoladoj de Gladstone de 1863 kaj 1864! Sed li ne kapricas,laŭ la maniero de Sedley Taylor, simple malaperigi ilin. Kaj la fina resumo en la respondo de E. Markso tekstas: „Male, Markso nek prisilentis ion citindan nek almensogis eĉ ion plej malgravan. Sed li restarigis kaj savis el forgeso certan frazon en parolado de Gladstone, kiu estis sen ajna dubo elparolita, sed kiu, iel aŭ alie, trovis sian vojon – el Hansard elen.”

Per tio s-ro Sedley Taylor nun ankaŭ tediĝis, kaj la rezulto de la tuta, tra du jardekoj kaj tra du grandaj landoj pluŝpinita profesora koterio estis, ke oni jam ne kuraĝis tuŝi la literaturan skrupulecon de Markso, sed ke post tio s-ro Sedley Taylor certe same malmulte fidos la literaturajn batalbultenojn de s-ro Brentano kiel s-ro Brentano la papisman certegecon de Hansard.

*Londono*, la 25-an de junio 1890

*F. Engelso*

# UNUA LIBRO – La produktadprocezo de la kapitalo

# UNUA SEKCIO – Varo kaj mono

## *UNUA ĈAPITRO – La varo*

### 1. La du faktoroj de la varo: uzvaloro kaj valoro (valorsubstanco, valorgrando)

La riĉaĵo de la socioj, en kiuj regas kapitalisma produktadmaniero, ŝajnas kvazaŭ „monstra varkolektaĵo”[1], la unuopa varo kvazaŭ ĝia elementa formo. Nia esploraĵo komenciĝas pro tio per la analizo de la varo.

La varo estas unue ekstera objekto, aĵo, kiu per siaj ecoj kontentigas iaspecajn homajn bezonojn. La naturo de tiuj bezonoj, ĉu ili devenas ekz-e el la stomako aŭ el la fantazio, ŝanĝas nenion en tiu afero.[2] Ankaŭ ne temas pri tio, ĉu ili kontentigas bezonon rekte kiel nutraĵo, do kiel objekto de ĝuo, aŭ ĉirkaŭvoje, kiel produktadrimedo.

Ĉia utilaĵo, kiel fero, papero ktp, konsiderendas el duobla vidpunkto,

---

1 Vd Karl Marx, „Zur Kritik der Politischen Ökonomie”, Berlino 1859, p. 3; vd MEW vol. 13, p. 15.

2 „La deziro inkludas bezonon; ĝi estas la apetito de la spirito, kaj tiel nature kiel malsato por la korpo … la plej multaj (aĵoj) havas sian valoron per tio ke ili kontentigas bezonojn de la spirito.” (Nicholas Barbon, „A Discourse on coining the new money lighter. In answer to Mr. Locke's Considerations etc.”, Londono 1696, p. 2,3.)

laŭ kvalito kaj kvanto. Ĉiu tia aĵo estas tutaĵo de multaj ecoj kaj pro tio povas utili je diversaj flankoj. Malkovri tiujn diversajn flankojn kaj pro tio la diversajn uzmanierojn de la aĵoj, estas historia faro.[3] Tiel la trovado de sociaj mezuroj por la kvanto de la utilaj aĵoj. La diverseco de la varmezuroj fontas parte el la diversa naturo de la mezurendaj aĵoj, parte el konvencio.

La utilo de aĵo faras ĝin uzvaloro.[4] Sed tiu utileco ne ŝvebas en la aero. Kondiĉite de la ecoj de la varkorpo, ĝi ne ekzistas sen tiu. La varkorpo mem, kiel fero, tritiko, diamanto ktp, estas pro tio uzvaloro aŭ havaĵo. Tiu ĝia karaktero ne dependas de tio ĉu la alproprigo de ĝiaj uzfunkcioj kostas al la homo multe aŭ malmulte da laboro. Ĉe konsidero de la uzvaloroj oni ĉiam antaŭkondiĉas ilian kvantan determinon, kiel dekon da horloĝoj[5], metron da tolo, tunon da fero ktp. La uzvaloroj de la varoj liveras la materialon de propra fako, la varscienco.[6] La uzvaloro realiĝas nur en la uzado aŭ konsumado. Uzvaloroj estigas la materian enhavon de riĉaĵo, kia ajn estas ĝia socia formo. En la socia formo de ni traktenda ili estigas samtempe la materian portanton de la – interŝanĝvaloro.

La interŝanĝvaloro ŝajnas unue kiel la kvanta rilato, la proporcio, en kiu uzvaloroj de iu speco interŝanĝiĝas kontraŭ uzvaloroj de alia speco,[7] rilato kiu konstante ŝanĝiĝas kun tempo kaj loko. La interŝanĝvaloro ŝajnas pro tio esti io hazarda kaj pure relativa, interŝanĝvaloro (valeur intrinsèque) interna, imanenta de la varo, do *contradictio in adjecto*[8]. Ni rigardu la

3 „Aĵoj havas intrinsick vertue” (tio ĉe Barbon la specifa esprimo por uzvaloro), „kiu estas ĉie sama, same kiel tiu de la magneto altiri feron” (l.c., p. 6). La eco de la magneto altiri feron fariĝis utila nur post kiam oni malkovris, pere de ĝi, la magnetan polusecon.

4 „La natura worth de ĉiu aĵo konsistas en sia taŭgeco kontentigi la necesajn bezonojn aŭ servi por la agrablaĵoj de la homa vivo.” (John Locke, „Some Considerations on the Consequences of the Lowering of Interest”, 1691, en „Works”, eld. Londono 1777, v. II, p. 28.) En la 17-a jarcento ni trovas ankoraŭ ofte ĉe anglaj verkistoj „Worth” por uzvaloro kaj „Value” por ŝanĝvaloro, tute en la spirito de lingvo, kiu ŝatas esprimi la rektan aĵon ĝermane kaj la reflektitan aĵon romane.

5 *En la originalo:* Dutzend Uhren (dekduo da horloĝoj). -vl

6 En la burĝa socio regas la *fictio juris*, ke ĉiu homo kiel varaĉetanto posedas enciklopedian varkonon.

7 „La valoro konsistas el la interŝanĝvaloro, kiu ekzistas inter unu aĵo kaj alia, inter la kvanto de iu produkto kaj tiu de alia.” (Le Trosne, „De l'Intérêt Social”, [en] „Physiocrates”, eld. Daire, Parizo 1846, p. 889.)

8 „Nenio povas havi internan interŝanĝvaloron” (*N. Barbon*, l.c. p. 6), aŭ, kiel

aferon iom pli proksime.

Certa varo, kvarto da tritiko ekz-e, interŝanĝiĝas kun x botciraĵo aŭ kun y silko aŭ kun z oro ktp, do alivorte en la plej diversaj proporcioj. Do, la tritiko havas diversajn interŝanĝvalorojn anstataŭ unu solan. Sed ĉar x botciraĵo, same y silko, same z oro ktp estas la interŝanĝvaloro de kvarto da tritiko, do x botciraĵo, y silko, z oro ktp devas esti inter si anstataŭigeblaj aŭ same grandaj ŝanĝvaloroj. El tio sekvas do unue: La validaj interŝanĝvaloroj de la sama varo esprimas ion saman. Sed due: La interŝanĝvaloro povas esti entute nur la esprimmaniero, la „aperformo" de enhavo distingebla de ĝi.

Ni prenu krome du varojn, ekz-e tritikon kaj feron. Kia ajn estas ilia interŝanĝrilato, ĝi estas ĉiam prezentebla per ekvacio, en kiu donita kvanto da tritiko estas egaligata kun ia kvanto da fero, ekz-e 1 kvarto da tritiko = a kilogramoj da fero[9]. Ambaŭ estas do samaj al io tria, kiu per si mem estas nek la unua nek la alia. Ĉiu de ambaŭ, kiel interŝanĝvaloro, devas do esti reduktebla al tiu tria.

Simpla geometria ekzemplo ilustru tion. Por mezuri la enhavon de areo de ĉiuj rektliniaj figuroj kaj kompari ilin, oni reduktas ilin al trianguloj. La triangulon mem oni reduktas al esprimo tute malsama al ĝia videbla figuro – la duona produto de ĝia bazlinio kun ĝia alto. Same la interŝanĝvaloroj de la varoj reduktendas al io komuna, de kiu ili prezentas ion plian aŭ malplian.

Tiu komuna ne povas esti geometria, fizika, ĥemia aŭ alia natura eco de la varoj. Iliaj korpaj ecoj entute nur konsidereblas tiom, kiom ili estas utiligeblaj, do kiel uzvaloroj. Sed aliflanke estas ĝuste la abstraktado de iliaj uzvaloroj, kio evidente karakterizas la interŝanĝrilaton de la varoj. Ene de ĝi, unu uzvaloro validas ĝuste tiom kiom ĉiu alia, se ĝi nur ekzistas en sufiĉa proporcio. Aŭ, kiel diras la olda *Barbon*:

> „La unu varspeco estas tiom bona kiom la alia, se ĝia interŝanĝvaloro estas same granda. Ne ekzistas diferenco aŭ distingeblo inter aĵoj de same granda interŝanĝvaloro."[10]

---

diras *Butler*: „La valoro de aĵo estas ĝuste tiom, kiom ĝi enspezigos."

9 *En la originalo:* „= a Ztr Eisen" (= a funtocentoj; funtocento, malnova germana pezunuo, egalas al 50 kg). -vl

10 „One sort of wares ar as good as another, if the value be equal. There is no diffenrence or distinction in things of equal value… One hundred pounds worth of lead or iron, is of as great a value as one hundred pounds worth of silver and gold." <„… Plumbo aŭ fero en la valoro de cent pundoj sterlingaj

Kiel uzvaloroj la varoj havas antaŭ ĉio diversan kvaliton, kiel interŝanĝvaloroj ili povas havi nur diversan kvanton, entenas do nenian atomon da uzvaloro.

Se oni apartigas la uzvaloron de la varkorpoj, tiam restas de ili nur unu eco, tiu de laborproduktoj. Sed ankaŭ la laborprodukto estas en nia operacio jam tuj ŝanĝita. Se ni abstraktas de ĝi la uzvaloron, tiam ni abstraktas ankaŭ la korpajn konsistigajn partojn kaj formojn kiuj faras ĝin uzvaloro. Ĝi ne estas plu tablo aŭ domo aŭ fadeno aŭ io alie utila. Ĉiuj ĝiaj korpaj ecoj estas estingitaj. Ĝi estas ankaŭ ne plu la produkto de lignaĵista laboro aŭ de iu alia produktiva laboro. Kun la utileco de la laborproduktoj malaperas la utileco de la laboroj en ili prezentitaj, malaperas do ankaŭ la diversaj konkretaj formoj de tiuj laboroj, ili jam ne distingiĝas, sed estas ĉiuj reduktitaj al sama homa laboro, abstrakta homa laboro.

Ni rigardu nun la restaĵon de la laborproduktoj. De ili restis nenio ol la sama fantomaĵo, nura gelateno de sendistinga homa laboro, do de elspezo de homa laborforto senkonsidere al la formo de ĝia elspezo. Tiuj aĵoj prezentas jam nur ke en ilia produktiĝo estas elspezita homa laborforto, estas amasigita homa laboro. Kiel kristaloj de tiu al ili komuna substanco ili estas valoroj – varvaloroj.

En la interŝanĝrilato de la varoj mem ilia interŝanĝvaloro aperis al ni kiel io tute sendependa de iliaj uzvaloroj. Se oni nun vere abstraktas la uzvaloron de la laborproduktoj, oni ricevas ilian valoron, kiel ĝi estis ĵus difinita. La komuno kio prezentiĝas en la interŝanĝrilato aŭ interŝanĝvaloro de la varo, estas do ĝia valoro. La sekvo de la analizo rekondukos nin al la interŝanĝvaloro kiel la necesa esprimmaniero aŭ aperformo de la valoro, kiu estas tamen unue rigardenda sendepende de tiu formo.

Uzvaloro aŭ havaĵo havas do valoron nur, ĉar abstrakta homa laboro estas en ĝi konkretigita aŭ materiigita. Kiel nun mezuri la grandon de ĝia valoro? Per la kvanto de en ĝi entenata „plivaloriga substanco", de laboro. La kvanton de laboro mem oni mezuras per ĝia tempodaŭro, kaj la labortempo siavice posedas sian skalon de certaj tempopartoj, kiel horo, tago ktp.

Povus ŝajni ke, se la valoro de varo estas determinata de la laborkvanto elspezita dum la produktado, ju pli mallaborema aŭ mallerta homo estas, des pli valora estas lia varo, ĉar li bezonas des pli da tempo por ĝia pretigo. Sed la laboro, kiu estigas la substancon de la valoroj, estas sama

havas same grandan ŝanĝvaloron kiel arĝento kaj oro en la valoro de cent pundoj sterlingaj."> (N. Barbon, l.c., p. 53 kaj 7.)

homa laboro, elspezo de la sama homa laborforto. La tuta laborforto de la socio, kiu prezentiĝas en la valoroj de la varmondo, validas ĉi tie kiel unu sama homa laborforto, kvankam ĝi konsistas el sennombraj individuaj laborfortoj. Ĉiu el tiuj individuaj laborfortoj estas la sama homa laborforto kiel la alia, en la mezuro laŭ kiu ĝi posedas la econ de socia mezuma laborforto kaj kiel tia socia mezuma laborforto efikas, do en la produktado de varo ankaŭ nur elspezas la mezume necesan aŭ socie necesan labortempon. Socie necesa labortempo estas labortempo bezonata por prezenti ian uzvaloron per la ekzistantaj socie normalaj produktadkondiĉoj kaj per la socia mezuma grado de lerteco kaj intenseco de la laboro. Post enkonduko de la vaporteksilo en Anglio ekz-e sufiĉis eble duona laborkvanto ol antaŭe por transformi donitan kvanton da fadeno en tolon. La angla manteksisto bezonis por tiu transformado efektive daŭre, la saman labortempon kiel antaŭe, sed la produkto de lia individua laborhoro prezentis nun nur duonan laborhoron kaj pro tio falis al la duono de sia antaŭa valoro.

Necesas do nur la kvanto de socia necesa laboro aŭ la socie necesa labortempo por produkti uzvaloron, kiu determinas ĝian valorgrandon.[11] La unuopa varo validas ĉi tie entute kiel mezuma ekzemplero de ĝia speco.[12] Varoj kiuj entenas same grandajn laborkvantojn aŭ kiuj produkteblas en la sama labortempo, havas do la saman valorgrandon. La valoro de varo rilatas al la valoro de ĉia alia varo kiel la labortempo necesa por la produktado de unu varo al la labortempo necesa por la produktado de la aliaj. „Kiel valoroj ĉiuj varoj estas nur certaj mezuroj de kristaliĝinta labortempo."[13]

La valorgrando de varo restus do konstanta, se la por ilia produktado bezonata labortempo estus konstanta. Sed tiu ŝanĝiĝas kun la ŝanĝoj en la produktivo de la laboro. La produktivo de la laboro estas determinata de

11 *Noto al la 2-a eldono:* „The value of them (the necessaries of life) when they are exchanged the one for another, is regulated by the quantity of labour necessarily required, and commonly taken in producing them." („La valoro de uzobjektoj, ekde kiam ili estas interŝanĝataj inter si, estas determinata de la kvanto de por ilia produktado bezonata kaj kutime aplikata laboro." („Some Thoughts on the Interest of Money in general, and particularly in the Public funds etc.", Londono, p. 36, 37.) Tiu stranga anonima verko de la antaŭa jarcento ne portas daton. Sed evidentiĝas el ĝia enhavo, ke ĝi aperis sub Georgo la 2-a, proksimume 1739 aŭ 1740.

12 „Ĉiuj samspecaj produktoj formas envere nur amason, kies prezo estas determinata ĝenerale kaj sen konsidero al la apartaj cirkonstancoj."

13 Karl Marx, l.c., p. 6 [vd MEW, vol 13, p. 18].

multaj cirkonstancoj, interalie per la mezuma grado de lerteco de la laboristoj, la evoluŝtupo de la scienco kaj de ĝia teĥnologia aplikeblo, la socia kombiniĝo de la produktadprocezo, de la amplekso kaj la efikkapablo de la produktadprocezo kaj per naturkondiĉoj. La sama kvanto de laboro prezentiĝas ekz-e kun favora sezono en 8 buŝeloj[14] da tritiko, kun malfavora en nur 4. La sama kvanto da laboro liveras pli da metaloj en riĉaj ol en malriĉaj minejoj ktp. Diamantoj troveblas malofte en la terkrusto, kaj ilia trovado kostas pro tio mezume multan labortempon. Sekve ili prezentas en malgranda volumeno multan laboron. Jacob pridubas ke oro iam ajn pagis ĝian plenan valoron. Tio veras eĉ pli pri diamantoj. Laŭ Eschwege, la okdekjara suma ekspluatado de la brazilaj diamantminejoj atingis 1823 ankoraŭ ne la prezon de la mezuma produkto de unu jaro kaj duono de la brazilaj suker- aŭ kafo-plantejoj, kvankam ĝi prezentis multe pli da laboro, do pli da valoro. Ĉe pli riĉaj minejoj la sama laborkvanto prezentiĝus en pli da diamantoj kaj ties valoroj malaltiĝus. Se oni sukcesas per malmulte da laboro transformi karbon en diamanton, tiam ties valoro povas fali sub tiun de brikoj. Ĝenerale: Ju pli grandas la produktivo de laboro, des pli malgrandas la por produktado de artiklo bezonata labortempo, des pli malgrandas la en ĝi kristaliĝinta laborkvanto, des pli malgrandas ĝia valoro. Inverse, ju pli malgrandas la produktivo de la laboro, des pli grandas la por produktado de artiklo necesa labortempo, des pli grandas ĝia valoro. La valorgrando de varo ŝanĝiĝas do rekte kiel la kvanto kaj inverse de la produktivo de la en ĝi realiĝanta laboro.[15]

Aĵo povas esti uzvaloro sen esti valoro. Tio estas la okazo kiam ĝia utilo por la homo ne estas perita de laboro. Tiel aero, virga grundo, naturaj herbejoj, sovaĝe kreskanta ligno ktp. Aĵo povas esti utila kaj produkto de homa laboro, sen esti varo. Kiu kontentigas per sia produkto sian propran bezonon, tiu ja kreas uzvaloron, sed ne varon. Por produkti varon, li devas produkti ne nur uzvaloron, sed uzvaloron por aliuloj, socian uzvaloron. (Kaj ne nur simple por aliuloj. La mezepoka terkulturisto produktis la tributgrenon por la feŭda sinjoro, la dekonaĵan grenon por la

---

14 Buŝelo estas mezuro de kapacito uzata en Britio kaj Usono por likvaĵoj kaj grenoj; la brita buŝelo egalas al 36,37 litroj, la usona al 35,24 l. (laŭ Erich-Dieter Krause: Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch, Buske, Hamburgo, 1999. -vl

15 *En la 1-a eldono sekvas:* Ni konas nun la *substancon* de la valoro. Ĝi estas la *laboro.* Ni konas ĝian *grandomezuron.* Ĝi estas la *labortempo.* Ĝia *formo,* kiu ĝuste stampas la *valoron* al *interŝanĝvaloro*, restas analizenda. Sed antaŭe la jam trovitaj difinoj estas iom pli detale disvolvendaj.

pastro. Sed nek tributgreno nek dekonaĵa greno fariĝas varoj per tio ke ili estis produktitaj por aliuloj. Por fariĝi varo, la produkto devas esti transigita al la aliulo, al kiu ĝi servas kiel uzvaloro, per interŝanĝo.)[16] Fine, aĵo povas esti valoro sen esti uzobjekto. Se ĝi estas senutila, tiam ankaŭ la en ĝi entenata laboro estas senutila, ne estas konsiderata laboro kaj pro tio ne estigas valoron.

## 2. Duobla eco de la laboro prezentita en la varoj

Komence la varo aperis al ni kiel io dunatura, uzvaloro kaj interŝanĝvaloro. Poste montriĝis, ke ankaŭ la laboro, laŭ tio ke ĝi estas esprimita en la valoro, jam ne posedas la samajn trajtojn kiujn ĝi havas kiel produktanto de uzvaloroj. Tiu duobla naturo de la laboro entenata en la varo estas kritike pruvita unue de mi.[17] Ĉar tiu punkto estas la esenca punkto, ĉirkaŭ kiu turniĝas la tuta kompreno de la politika ekonomio, ĝi estu ĉi tie pli detale prilumota.

Ni prenu du varojn, ekz-e unu jakon kaj 10 ulnojn[18] da tolo. La unua havu la duoblan valoron de la lasta, tiel ke, se 10 ulnoj da tolo = v, la jako = 2 v.

La jako estas uzvaloro, kiu kontentigas apartan bezonon, Por produkti ĝin, necesas certa speco de produkta agado. Tiu estas determinita de ĝia celo, farmaniero, objekto, rimedo kaj rezulto. La laboron, kies utileco tiel prezentiĝas en la uzvaloro de sia produkto aŭ en tio ke ĝia produkto estas uzvaloro, ni nomas mallonge utila laboro. Sub tiu vidpunkto ĝi estas ĉiam rigardata kun rilato al ĝia utila efiko.

Kiel jako kaj tolo estas kvalite malsamaj uzvaloroj, tiel iliaj laboroj, kiuj peras al ili ilian ekziston, estas kvalite malsamaj – tajlorado kaj teksado. Se tiuj aĵoj ne estus kvalite malsamaj uzvaloroj kaj pro tio produktoj de kvalite malsame utilaj laboroj, ili tute ne povus renkontiĝi kiel varoj. Jako ne interŝanĝiĝas kun jako, la sama uzvaloro ne kontraŭ la sama uzvaloro.

---

16 *Noto al la 4-a eldono:* Mi enŝovas la interkrampan tekston, ĉar sen ĝi estiĝis ofte la miskompreno, kvazaŭ ĉiu produkto konsumata de iu alia ol la produktinto rolus ĉe Markso kiel varo. – F[rederiko] E[ngelso].

17 l. c. p. 12, 13 kaj poste. [Vd MEW vol. 13, p. 22, 23 kaj sekvaj].

18 Ulno estas malnova longomezuro, aparte por tukoj; la angla ulno = 1,114 metroj (laŭ Krause, Gr.W.E-D., v.c.) -vl

En la tutaĵo de la diversaj uzvaloroj aŭ varkorpoj aperas tutaĵo de same multecaj, laŭ genro, speco, familio, subspeco, variaĵo malsamaj utilaj laboroj – socia labordivido. Ĝi estas ekzistkondiĉo de la varproduktado, kvankam varproduktado ne estas inverse la ekzistkondiĉo de socia labordivido. En la prahinda komunumo la laboro estas socie dividita, sen ke la produktoj fariĝas varoj. Aŭ, pli proksima ekzemplo, en ĉiu fabriko la laboro estas sisteme dividita, sed tiu divido ne estas perata per tio ke la laboristoj interŝanĝas siajn individuajn produktojn. Nur produktoj de memstaraj kaj inter si sendependaj privatlaboroj renkontiĝas kiel varoj.

Oni vidis do: en la uzvaloro de ĉiu varo troviĝas certa laŭcele produkta agado aŭ utila laboro. Uzvaloroj ne povas renkontiĝi kiel varoj, se ne troviĝas kvalite malsamaj utilaj laboroj en ili. En socio, kies produktoj ĝenerale alprenas la formon de varo, do en socio de varproduktantoj, tiu kvalita diferenco de la utilaj laboroj, kiuj estas okazigataj sendepende de unu rilate la alian kiel privataj aferoj de memstaraj produktantoj, disvolviĝas al multartika sistemo, al socia labordivido.

Al la jako estas cetere egale, ĉu ĝi estas portata de la tajloro aŭ de ties kliento. En ambaŭ okazoj ĝi efikas kiel uzvaloro. Same malmulte ŝanĝiĝas per si mem la rilato inter la jako kaj la ĝin produktanta laboro, per tio ke la tajlorado fariĝas aparta metio, memstara membro de la socia labordivido. Kie la vestadbezono trudis sin al la homo, tiu tajloris dum jarmiloj, antaŭ ol homo fariĝis tajloro. Sed la ekzisto de jako kaj de tolo, elemento de materia riĉaĵo ne ekzistanta en la naturo, estis ĉiam nepre perata de speciala, laŭcele produktanta agado, kiu asimilas apartajn naturmaterialojn al apartaj homaj bezonoj. Kiel formanto de uzvaloroj, kiel utila laboro, la laboro estas pro tio ekzistkondiĉo de la homo, sendependa de ĉiaj sociformoj, eterna naturneceso, por peri la metabolismon inter homo kaj naturo, do la homan vivon.

La uzvaloroj jako, tolo ktp, do la varkorpoj, estas kunmetaĵoj de du elementoj, naturmaterialo kaj laboro. Se oni deprenas la tutan sumon de ĉiuj diversaj utilaj laboroj, kiuj troviĝas en la jako, tolo ktp, tiam restas ĉiam materia substrato, kiu ekzistas en la naturo sen homa interveno. La homo povas agi en sia produktado nur kiel la naturo mem, do nur ŝanĝi la formojn de la materialoj.[19] Eĉ pli. En tiu laboro de formado mem li estas

19 „Ĉiuj fenomenoj de la kosmo, ĉu estigitaj de la homa mano aŭ de la ĝeneralaj leĝoj de fiziko, ne estas faktaj novkreaĵoj, sed nur transformaĵoj de la materialo. Kunmetado kaj disigado estas la solaj elementoj, kiujn la homa menso ĉiam denove trovas ĉe la analizo de la regulado de la reproduktado; kaj same okazas kun la reproduktado de la valoro” (uzvaloro, kvankam Verri ĉi tie en

konstante subtenata de naturfortoj. Laboro estas do ne la sola fonto de uzvaloroj produktataj de ĝi, de la materia riĉaĵo. La laboro estas ĝia patro, kiel diras William Petty, kaj la tero ĝia patrino.

Ni transiru nun de la varo, kiel uzobjekto, al la var-valoro.

Laŭ nia hipotezo, la jako havas la duoblan valoron de la tolo. Sed tio estas nur kvalita diferenco, kiu en la momento ankoraŭ ne interesas nin. Pro tio ni memorigu ke, se la valoro de jako estas duoblo de tiu de 10 ulnoj da tolo, 20 ulnoj da tolo havas la saman valorgrandon kiel jako. Kiel valoroj, jako kaj tolo estas aĵoj de sama substanco, objektivaj esprimoj de samspeca laboro. Sed tajlorado kaj teksado estas kvalite malsamaj laboroj. Sed ekzistas sociaj kondiĉoj, en kiuj la sama homo alterne tajloras kaj teksas, en kiu tiuj du malsamaj labormanieroj estas do nur modifoj de la laboro de la sama individuo kaj ankoraŭ ne apartaj fiksaj funkcioj de diversaj individuoj, same kiel la jako, kiun la tajloro faras hodiaŭ, kaj la pantalonoj, kiujn li faros morgaŭ, antaŭkondiĉas nur variaĵojn de la sama individua laboro. La evidento instruas krome, ke en nia kapitalisma socio, laŭ la ŝanĝiĝanta direkto de la laborpostulo, donita kvanto da homa laboro estas aldonita alterne en formo de tajlorado aŭ en la formo de teksado. Tiu formŝanĝiĝo de la laboro eble ne okazas sen interfrotiĝoj, sed ĝi devas okazi. Se oni abstraktas de ĝi la destinitecon de la produkta agado kaj do la utilecon de la laboro, tiam restas en ĝi tio ke ĝi estas elspezo de homa laborforto. Tajlorado kaj teksado, kvankam kvalite malsamaj produktaj agadoj, estas ambaŭ produkta elspezo de homa cerbo, muskolo, nervo, mano ktp, kaj tiusence ambaŭ homa laboro. Ili estas nur du formoj de elspezata homa laborforto. Tamen la homa laborforto mem devas esti pli aŭ malpli evoluinta, por elspeziĝi en tiu aŭ alia formo. Sed la valoro de la varo prezentas homan laboron ĝenerale, la elspezon de homa laboro entute. Kiel nun en la burĝa socio generalo aŭ bankisto ludas grandan, sed la homo ĝenerale nur tre mizeran rolon[20], tiel okazas ankaŭ ĉi tie kun la homa laboro. Ĝi estas elspezo de simpla laborforto, kiun mezume posedas ĉiu ordinara homo, sen aparta evoluo, en sia korpa organismo. La *simpla*

sia polemiko kontraŭ la fiziokratoj mem ne bone scias, pri kiu speco de valoro li parolas) „kaj de la riĉaĵo, kiam tero, aero kaj akvo sur la kampoj transformiĝas en grenon, aŭ kiam per la homa mano la elfluigaĵo de insekto transformiĝas al silko, aŭ kiam kelkaj metalpecoj unuiĝas por fariĝi horloĝo.” (Pietro Verri, „Meditazioni sulla Economia Politica” – unue presita 1771 – en la eldono de la itala ekonomikisto von Custodi, Parte Moderna, vol. 15, p. 21, 22.)

20 Kp Hegel, „Philosophie des Rechts” [Hegelo, „Jurfilozofio”], Berlino 1840, p. 250, § 190.

*mezuma laboro* mem ja ŝanĝas en diversaj landoj kaj kulturepokoj sian karakteron, sed estas donita en ekzistanta socio. Pli komplika laboro estas kalkulata nur kiel *potencita* aŭ pli ĝuste *obligita* simpla laboro, tiel ke pli malgranda kvanto da komplika laboro egalas al pli granda kvanto da simpla laboro. Ke tiu reduktado okazas konstante, tion montras la sperto. Varo povas esti la produkto de la plej komplika laboro, ĝia *valoro* egaligas ĝin al la produkto de simpla laboro kaj pro tio prezentas nur certan kvanton da simpla laboro.[21] La diversaj proporcioj, laŭ kiuj diversaj laborspecoj estas reduktitaj al simpla laboro kiel ilia mezurunuo, estas determinataj de socia procezo malantaŭ la dorso de la produktantoj kaj pro tio ŝajnas al tiuj esti donitaj de ilia deveno. Pro simpleco ni komprenu en la sekvo ĉian specon de laborforto rekte kiel simplan laborforton, per kio ni nur ŝparas la klopodon de reduktado.

Kiel oni do abstraktas en la valoroj jako kaj tolo la diferencon de iliaj uzvaloroj, tiel en la laboroj, kiuj konkretiĝas en tiuj valoroj, la diferencon de iliaj utilaj formoj, de tajlorado kaj de teksado. Kiel la uzvaloroj jako kaj tolo estas kunmetaĵoj de laŭcelaj produktaj agadoj per tuko kaj fadeno, la valoroj jako kaj tolo estas aliflanke nur samspecaj laborgelatenoj, tiel ankaŭ la en tiuj valoroj entenataj laboroj validas ne pro sia produkta sinteno al tuko kaj fadeno, sed nur kiel elspezo de homa laborforto. Estigaj elementoj de la uzvaloroj jako kaj tolo estas tajlorado kaj teksado ĝuste pro siaj malsamaj kvalitoj; substanco de la jakvaloro kaj teksaĵvaloro ili estas nur tiom kiom oni abstraktas ilian apartan kvaliton kaj ili posedas ambaŭ saman kvaliton, la kvaliton de homa laboro.

Sed jako kaj tolo estas ne nur valoroj ĝenerale, sed valoroj de certa grando, kaj laŭ nia hipotezo la jako valoras duoble la 10 ulnojn da tolo. Pro kio tiu diferenco de iliaj valorgrandoj? Pro tio ke la tolo entenas nur duone da laboro ol la jako, tiel ke por ties produktado la laborforto elspezendas dum duoble da tempo ol por produktado de la tolo.

Se do, konsidere la uzvaloron, la laboro entenata en la varo validas nur kvalite, ĝi validas konsidere la valorgrandon nur kvante, post kiam ĝi estas jam reduktita al homa laboro sen plia kvalito. Tie temas pri la kielo kaj kio de la laboro, ĉi tie pri ĝia kiomo, ĝia daŭro. Ĉar la valorgrando de varo prezentas nur la kvanton de la laboro en ĝi entenata, varoj en certa proporcio devas ĉiam esti samgrandaj valoroj.

21 La leganto atentu ke ĉi tie ne temas pri salajro aŭ valoro kiun la laboristo ricevas ekzemple por unu labortago, sed pri varvaloro, en kiu konkretiĝas lia labortago. La kategorio de laborsalajro ankoraŭ entute ne ekzistas sur tiu ĉi ŝtupo de nia prezentaĵo.

Se la produktivo, do ĉiuj laboroj necesaj por produktado de jako, restas senŝanĝa, tiam la valorgrando de la jakoj kreskas kun ilia propra kvalito. Se 1 jako x, tiam 2 jakoj prezentas 2 x labortagojn, ktp. Sed hipotezu ke la necesa laboro por produktado de jako kreskas al duoblo aŭ falas al duono. En la unua kazo, jako havas la saman valoron kiel du jakoj antaŭe, en la dua kazo, du jakoj havas nur tiom da valoro kiom antaŭe unu, kvankam en ambaŭ kazoj unu jako faras daŭre la samajn servojn kiel antaŭe kaj la utila laboro kiun ĝi entenas restas daŭre samkvalita. Sed ŝanĝiĝis la laborkvanto elspezita en ĝia produktado.

Pli granda kvanto da uzvaloro faras ĝenerale pli grandan materian riĉaĵon, du jakoj pli ol unu. Per du jakoj eblas vesti du homojn, per unu jako nur unu homon, ktp. Tamen kreskanta kvanto de materia riĉaĵo povas kongrui kun samtempa falo de ĝia valorgrando. Tiu kontraŭdira moviĝo fontas el la duspea karaktero de la laboro. Produktivo estas nature ĉiam produktivo de utila, konkreta laboro kaj determinas efektive nur la efikogradon de laŭcela produkta agado en donita tempospaco. La utila laboro fariĝas pro tio pli riĉa aŭ pli malriĉa produktofonto en rekta proporcio al kresko aŭ malkresko de ĝia produktivo. Aliflanke ŝanĝo de produktivo ĝenerale tute ne tuŝas la valoron de la laboro prezentita en la valoro. Ĉar la produktivo apartenas al la konkreta utila formo de laboro, ĝi komprenneble jam ne povas tuŝi la laboron ekde kiam oni ne konsideras ĝian konkretan utilan formon. La sama laboro donas do en la samaj tempospacoj ĉiam la saman valorgrandon, kiel ajn la produktivo ŝanĝiĝas. Sed ĝi liveras en la sama tempospaco diversajn kvantojn da uzvaloroj: pli, kiam kreskas la produktivo, malpli, kiam ĝi malkreskas. La sama ŝanĝiĝo de la produktivo, kiu pliigas la fekundecon de la laboro kaj pro tio pliigas la kvanton de uzvaloroj kiujn ĝi liveras, do malpliigas la valorgrandon de tiu pliigita tuta kvanto, kiam ĝi mallongigas la sumon de labortempo necesa por ĝia produktado. Same inverse.

Ĉia laboro estas unuflanke elspezo de homa laborforto en korpa senco, kaj en tiu eco de sama homa aŭ abstrakte homa laboro ĝi estigas la varvaloron. Ĉia laboro estas aliflanke elspezo de homa laborforto en aparta laŭcela formo, kaj en tiu eco de konkreta utila laboro ĝi produktas uzvalorojn.[22]

22 *Noto al la 2-a eld.* Por pruvi „ke sole la laboro estas la definitiva kaj reala mezuro, laŭ kiu la valoro de ĉiuj varoj en ĉiuj tempoj takseblas kaj kompareblas”, diras A. Smith: „Samaj kvantoj da laboro devas en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj lokoj havi por la laborito mem la saman valoron. En sia normala stato de sano, forto kaj aktiveco kaj kun la averaĝa grado de lerteco, kiun li supoze posedas, li devas ĉiam fordoni la saman porcion da sia trankvilo, sia

# 3. La valorformo aŭ interŝanĝvaloro

Varoj enmondiĝas en la formo de uzvaloroj aŭ varkorpoj, kiel fero, tolo, tritiko ktp. Tio estas ilia kutime spertata naturformo. Sed ili estas varoj nur ĉar io duobla, uzobjektoj kaj samtempe valorportantoj. Ili aperas do nur kiel varoj aŭ posedas nur la formon de varoj, se ili posedas la duoblan formon, naturformon kaj valorformon.

La valorkonkreteco de la varoj distingiĝas disde la vidvino Pretino per tio ke neniu scias kie ĝi estas havebla. En rekta kontrasto al la sense maldelikata konkreteco de la varkorpoj, neniu atomo da natursubstanco eniras ilian valorkonkretaĵon. Pro tio oni povas kiom ajn tuŝi kaj turni unuopan varon, ĝi restas kiel valoraĵo netuŝebla. Sed ni memoru ke la varoj posedas nur valorkonkreton se ili estas esprimoj de la sama socia unuo, homa laboro, ke ilia valorkonkreteco estas do pure socia, tiam estas ankaŭ memkomprenebla ke ĝi povas aperi nur en la socia rilato de varo al varo. Ni eliris efektive de la interŝanĝvaloro aŭ interŝanĝrilato de la varoj, por trovi la spuron de ilia en ĝi kaŝita valoro. Ni devas nun reveni al tiu aperformo de la valoro.

Ĉiu scias, eĉ se li scias nenion alian, ke la varoj posedas valorformon kiu plej frape kontrastas kun la buntaj naturformoj de iliaj uzvaloroj – la

libereco kaj sia feliĉo." („Wealth of Nations", b.I, ch. V, [p. 104/105].) Unuflanke A. Smith konfuzas ĉi tie (ne ĉie) la determinon de la valoro per la laborkvanto elspezita en la produktado de la varo kun la determino de la varvaloroj per la valoro de la laboro kaj pro tio provas pruvi ke samaj laborkvantoj havas ĉiam la saman valoron. Aliflanke li komprenetas ke la laboro, tia kia ĝi prezentiĝas en la valoro de la varoj, estas nur elspezo de laborforto, sed konceptas tiun elspezadon ree nur kiel ofero de trankvilo, libereco kaj feliĉo, ne ankaŭ kiel normala vivagado. Sed li ja celas la modernan dunglaboriston. – Multe pli trafe diras la anonima antaŭulo de A. Smith, citita en noto 9: „Viro destinis semajnon por fabrikado de tiu uzobjekto… kaj tiu, kiu donas al li alian objekton interŝanĝe, ne povas pli ĝuste taksi kio estas vere samvalora, ol per kalkulado de tio kio kostas al li same multan laboron kaj tempon. Tio signifas efektive la interŝanĝon de laboro, kiun homo en difinita tempo aplikis al objekto, kontraŭ la laboro de alia, aplikita en la sama tempo al alia objekto." („Some Thoughts on the Interest of Money in general etc.", p. 39.) –[*Noto al la 4-a eld-o:* La angla lingvo havas la avantaĝon ke ĝi disponas pri du diversaj vortoj por tiuj du diversaj aspektoj de la laboro. La laboro kiu kreas uzvalorojn kaj estas kvalite difinita, nomiĝas work, kontraste al labour; la laboro kiu kreas valoron kaj estas mezurata nur kvante, nomiĝas labour kontraste al work. Vidu la noton pri la angla traduko, p. 14. –F. E.]

monformon. Sed ĉi tie ni devas plenumi tion kion la burĝa ekonomiko eĉ ne provis fari, nome montri la estiĝon de tiu monformo, do la evoluon de la valoresprimo, entenata en la valorrilato de la varoj, de ĝia plej simpla nevidebla formo ĝis la brila monformo. Per tio malaperas samtempe la monenigmo.

La plej simpla valorrilato estas evidente la valorrilato de varo al alia, ia ajn diversa varo. La valorrilato de du varoj donas do la plej simplan valorrilaton por varo.

### *A) Simpla, unuopa aŭ hazarda valorformo*

x varo A = y varo B aŭ: x varo A valoras y varon B.

(20 ulnoj da tolo = 1 jako aŭ: 20 ulnoj da tolo valoras 1 jakon.)

## 1. La du polusoj de la valoresprimo: relativa valorformo kaj ekvivalentformo

La sekreto de ĉia valorformo kuŝas en tiu simpla valorformo. Ties analizo entenas do ĝuste la malfacilaĵon.

Ĉi tie du diversaj varoj A kaj B, en nia ekzemplo tolo kaj jako, ludas evidente du diversajn rolojn. La tolo esprimas sian valoron en jako, la jako servas kiel materialo por tiu valoresprimo. La unua varo ludas aktivan, la dua pasivan rolon. La valoro de la unua varo estas prezentata kiel relativa valoro, aŭ ĝi troviĝas en relativa valorformo. La dua varo funkcias kiel ekvivalento aŭ troviĝas en ekvivalentformo.

Relativa valorformo kaj ekvivalentformo estas aspektoj kiuj apartenas unu al la alia, kondiĉas sin reciproke, estas nedisigeblaj, sed samtempe ili estas ekstremaĵoj reciproke sin ekskludantaj aŭ kontraŭecaj, t.e. polusoj de la sama valoresprimo; ili distribuiĝas ĉiam sur la diversaj varoj, kiujn la valoresprimo rilatigas unu al la alia. Mi ekz-e ne povas esprimi la valoron de la tolo per tolo. 20 ulnoj da tolo = 20 ulnoj da tolo ne estas valoresprimo. La ekvacio diras, male: 20 ulnoj da tolo estas nenio alia ol 20 ulnoj da tolo, certa kvanto de la uzobjekto tolo. La valoro de la tolo esprimeblas do nur relative, do per alia varo. Pro tio la relativa valorformo de la tolo kondiĉas ke ia ajn alia varo troviĝu fronte al ĝi en ekviva-

lentformo. Aliflanke, tiu alia varo, kiu rolas kiel ekvivalento, ne povas samtempe troviĝi en relativa valorformo. Ne tiu esprimas ĝian valoron. Ĝi liveras nur la materialon al la valoresprimo de alia varo.

Tamen la esprimo: 20 ulnoj da tolo = 1 jako aŭ 20 ulnoj da tolo valoras 1 jakon, inkludas ankaŭ la reciprokon: 1 jako = 20 ulnoj da tolo aŭ 1 jako valoras 20 ulnojn da tolo. Sed tiel mi devas do inversigi la ekvacion, por esprimi la valoron de la jako relative, kaj ekde kiam mi faras tion, la tolo fariĝas ekvivalento anstataŭ la jako. La sama varo povas do en la sama valoresprimo ne aperi samtempe en ambaŭ formoj. Tiuj ekskludas sin polusece.

Ĉu varo troviĝas en relativa valorformo aŭ en la kontraŭa ekvivalentformo, dependas ekskluzive de ĝia ĉiufoja loko en la valoresprimo, do de tio, ĉu ĝi estas la varo kies valoro esprimiĝas, aŭ la varo per kiu esprimiĝas valoro.

## 2. La relativa valorformo

### a) Enteno de la relativa valorformo

Por eltrovi, kiel la simpla valoresprimo de varo kuŝas en la valorrilato de du varoj, oni devas konsideri tiun lastan unue tute sendepende de ĝia kvanta flanko. Oni procedas plej ofte inverse kaj vidas en la varrilato nur la proporcion en kiu certaj kvantoj de du varspecoj egalvaloras. Oni pretervidas, ke la grandoj de diversaj aĵoj fariĝas kompareblaj nur post ilia reduktado al la sama unuo. Nur kiel esprimoj de la sama unuo ili estas samnomaj, pro tio mezureblaj grandoj.[23]

Ĉu 20 ulnoj da tolo = 1 jako aŭ = 20 aŭ = x jakoj, do ĉu donita kvanto da tolo valoras multajn aŭ malmultajn jakojn, ĉiu tia proporcio ĉiam inkludas ke tolo kaj jakoj kiel valorgrandoj estas esprimoj de la sama unuo, aĵoj de la sama naturo. tolo = jako estas la bazo de la ekvacio.

23 La malmultaj ekonomikistoj, kiuj, kiel S. Bailey, okupiĝis pri la valorformo, ne povis atingi rezulton, unue ĉar ili konfuzis valorformon kaj valoron, due ĉar ili, sub la kruda influo de la praktika burĝo, dekomence konsideras ekskluzive nur la kvantan aspekton. „La dispono pri la kvanto … faras la valoron.” („Money and its Vicissitudes”, Londono 1837, p. 11) Aŭtoro S. Bailey.

Sed la du kvalite samigitaj varoj ne ludas la saman rolon. Nur la valoro de la tolo estas esprimita. Kaj kiel? Per ĝia rilato al la jako kiel ĝia „ekvivalento” aŭ io kun ĝi interŝanĝebla. En tiu rilato la jako funkcias kiel ekzistoformo de valoro, kiel valoraĵo, ĉar nur kiel tia ĝi estas la samo kiel la tolo. Aliflanke la propra valor-esto de la tolo aperas aŭ ricevas memstaran esprimon, ĉar nur kiel valoro ĝi estas rilatigebla al la jako kiel samvaloraĵo aŭ kiel io interŝanĝebla. Tiel, la buteracido estas korpo diversa de la propilformato. Sed ambaŭ konsistas el la samaj ĥemiaj substancoj – karbono (C), hidrogeno (H) kaj oksigeno (O), kaj krome en la sama elcenta kunmetaĵo, nome $C_4H_8O_2$. Se oni samigus la buteracidon kun la propilformato, tiam en tiu rilato la propilformato estus konsiderata nur kiel ekzistoformo de $C_4H_8O_2$, kaj due estus dirite ke ankaŭ la buteracido konsistas el $C_4H_8O_2$. Per samigo de propilformato kun buteracido esprimiĝus do ĝia ĥemia substanco kontraste al ĝia korpa formo.

Se ni diras: konsiderataj kiel valoroj, la varoj estas nura gelateno de homa laboro, tiam nia analizo reduktas ilin al la valorabstraktaĵo, sed ne donas al ili valorformon diversan de iliaj naturformoj. Alie okazas en la valorrilato de varo al alia. Ĝia valoreco ĉi tie aperas per sia propra rilato al la alia varo.

Per tio ke oni ekz-e samigas la jakon kiel valoraĵon kun la tolo, oni samigas la laboron troviĝantan en tiu ĉi al la laboro troviĝanta en tiu. Estas vere ke la tajlorado, kiu faras la jakon, estas konkreta laboro diversa de tiu de la teksado kiu faras la tolon. Sed la samigo kun la teksado reduktas la tajloradon efektive al la vera samo en ambaŭ laboroj, al ilia komuna eco de homa laboro. Per tiu ĉirkaŭvojo estas tiam dirite, ke ankaŭ la teksado, teksante valoron, ne posedas trajtojn kiuj distingas ĝin de la tajlorado, ke ĝi estas do abstrakta homa laboro. Nur la ekvivalentesprimo de diversaj varoj aperigas la specifecon de la plivaloriga laboro, per tio ke ĝi reduktas la diversspecajn laborojn troviĝantajn en la diversspecaj varoj al ilia komunaĵo, al la homa laboro entute.[24]

---

24 *Noto al la 2-a eldono:* Unu el la unuaj ekonomikistoj, kiu travidis la naturon de la valoro post William Petty, la fama Franklin, diris: „Ĉar la komerco estas entute nenio alia ol la interŝanĝo de unu laboro kontraŭ alia laboro, la valoro de ĉiuj aĵoj estas plej bone taksata en laboro.” („The Works of B. Franklin etc.”, edited by Sparks, Boston 1936, v. II. P. 267.) Franklin ne konscias ke, taksante la valoron de ĉiuj aĵoj „en laboro”, li abstraktas la diversecon de la interŝanĝataj laboroj – kaj tiel reduktas ĝin al sama homa laboro. Tio, kion li ne scias, li tamen diras. Li parolas unue pri „unu laboro”, poste pri „la alia laboro”, fine pri „laboro” sen kroma signado kiel substanco de la valoro de ĉiuj aĵoj.

Tamen ne sufiĉas esprimi la specifecon de la laboro el kiu estiĝas la tolo. Homa laborforto en flua stato aŭ homa laboro estigas valoron, sed ne estas valoro. Ĝi fariĝas valoro en koaguliĝinta stato, en konkreta formo. Por esprimi la valoron de tolo kiel gelateno de homa laboro, ĝi esprimendas kiel „konkretaĵo", kiu estas aĵe diversa de la tolo mem kaj samtempe sama kun ĝi kaj kun alia varo. La tasko estas jam solvita.

En la valorrilato de la tolo la jako validas kiel io kvalite sama kun ĝi, kiel aĵo de sama naturo, ĉar ĝi estas valoro. La jako validas ĉi tie kiel aĵo en kiu aperas valoro aŭ kiu en sia palpebla naturformo prezentas valoron. Estas vere ke la jako, la korpo de la jakvaro, estas nura uzvaloro. Jako tute ne esprimas valoron, same kiel ia ajn peco da tolo. Tio pruvas nur, ke ĝi ene de la valorrilato al tolo signifas pli ol ekstere de ĝi, same kiel iu homo ene de galonita jako signifas pli ol ekstere de ĝi.

En la produktado de la jako elspeziĝis efektive, en formo de tajlorado, homa laborforto. Amasiĝis do homa laboro en ĝi. Tiuflanke la jako estas „portanto de valoro", kvankam tiu ĝia eco ne videblas tra ĝi, eĉ se la jako travidigas jam ĉiujn unuopajn fadenojn[25]. Kaj en la valorrilato de la tolo la jako konsidereblas nur en tiu sia flanko, do kiel korpigita valoro, kiel valorkorpo. Malgraŭ ties sekretemo, la tolo rekonis en ĝi la parencan belan animon. Sed la jako rilate al la tolo ne povas prezenti valoron, sen ke por la tolo la valoro samtempe alprenas la formon de jako. Tiel la individuo A ne povas rilati al la individuo B kiel moŝto, sen ke por A la moŝteco alprenas samtempe la korpan figuron de B kaj do ŝanĝas vizaĝajn trajtojn, hararon kaj ankoraŭ multon alian kun la respektiva ŝtatestro.

En la valorrilato, en kiu la jako estas la ekvivalento de la tolo, la jakformo konsiderendas do kiel valorformo. La valoro de la varo tolo estas do esprimata en la korpo de la varo jako, la valoro de varo en la uzvaloro de la alia. La tolo kiel uzvaloro estas io sense alia ol la jako, kiel valoro ĝi estas „io jaksama" kaj do aspektas kiel jako. Tiel ĝi ricevas valorformon diversan de ĝia naturformo. Ĝia valor-esto aperas en ĝia sameco kun la jako kiel la ŝafeco de kristano en lia sameco kun la ŝafido de Dio.

Oni do vidas: ĉion, kion antaŭe diris al ni la analizo de la varvaloro, diras la tolo mem, ekde kiam ĝi ekrilatas kun alia varo, la jako. Sed ĝi malkaŝas siajn pensojn en la sola al ĝi kutima lingvo, la varlingvo. Por diri, ke la laboro en la abstrakta eco de homa laboro formas ĝian propran

25 *Originale: Fadenscheinigkeit*, germana esprimo, unue por triviteco de vestaĵo, kiu vidigas la fadenojn, krome figurasence: travideblo de la vera (eble kaŝita) motivo en ago aŭ diro. -vl

valoron, ĝi diras, ke la jako, en tio ke ĝi samvaloras al ĝi, do estas valoro, konsistas el la sama laboro kiel la tolo. Por diri, ke ĝia sublima valor-konkreteco estas diversa de ĝia teksita korpo, ĝi diras, ke valoro aspektas kiel jako kaj pro tio ĝi mem similas al la jako kiel unu ovo al alia. Preter-pase dirite, ankaŭ la varlingvo havas, krom la hebrean, ankoraŭ multajn pliajn pli aŭ malpli ĝustajn dialektojn. La germana „Wertsein”[26] esprimas ekz-e malpli trafe ol la latinida verbo valere, valer, valoir, ke samigo de la varo B kun la varo estas la propra valoresprimo de la varo A. Paris vaut bien une messe! <Parizo ja valoras meson!>

Do, pere de la valorrilato, la naturformo de la varo B fariĝas la valor-formo de la varo A, aŭ la korpo de la varo B la valorspegulo de la varo A.[27] Per tio, ke la varo A rilatigas sin al la varo B kiel varkorpo, kiel materiaĵo de homa laboro, ĝi faras la uzvaloron B materialo de sia propra valoresprimo. La valoro de la varo A, tiel esprimita en la uzvaloro de la varo B, posedas la formon de la relativa valoro.

## b) Kvanta determineco de la relativa valorformo

Ĉiu varo, kies valoro esprimendas, estas uzobjekto de donita kvanto, 15 buŝeloj da tritiko, 100 pundoj da kafo ktp. Tiu donita varkvanto entenas certan kvanton da homa laboro. La valorformo do ne esprimendas valoron entute, sed kvante difinitan valoron aŭ valorgrandon. Do, en la valorrilato de la varo A al la varo B, de la tolo al la jako, la varspeco jako ne estas kvalite samigata kiel valorkorpo entute kun la tolo, sed kun certa kvanto da tolo, ekz-e 20 ulnoj da tolo, certa kvanto de la varkorpo aŭ de ekvi-valento, ekz-e 1 jako.

La ekvacio: „20 ulnoj da tolo = 1 jako” aŭ: „20 ulnoj da tolo valoras 1 jakon” antaŭkondiĉas ke en 1 jako troviĝas ĝuste tiom da valorsubstanco kiel en 20 ulnoj da tolo, ke ambaŭ varkvantoj kostas do same multan laboron aŭ same grandan labortempon. Sed la labortempo necesa por produktado de 20 ulnoj da tolo aŭ de 1 jako ŝanĝiĝas kun ĉia ŝanĝo en la produktivo de teksado aŭ de tajlorado. La influo de tiaj ŝanĝoj sur la reala

26 *Laŭvorte:* valor-esto. -vl

27 Iel al la homo okazas kiel al la varo. Ĉar li enmondiĝas nek kun spegulo nek kiel filozofo kiel Fichte: *Mi estas mi*, la homo spegulas sin unue en alia homo. Nur per rilatigo al la homo Paŭlo kiel siaspeculo la homo Petro rilatigas al si mem kiel al homo. Sed per tio, tiu Paŭlo estas por li, de kapo ĝis piedo, en sia Paŭla korpeco, la aperformo de la specio homo. [Kursivigo de -vl]

esprimo de la valorgrando estas nun pli detale esplorenda.

I. La valoro de la tolo ŝanĝiĝu[28], dum la jakvaloro restu konstanta. Se la labortempo necesa por produktado de tolo duobliĝas, ekzemple pro kreskanta malfekundeco de la linoportanta grundo, tiam duobliĝas la valoro de la tolo. Anstataŭ 20 ulnoj da tolo = 1 jako ni havus 20 ulnoj da tolo = 2 jakoj, ĉar 1 jako entenas nun nur duonon da labortempo ol 20 ulnoj da tolo. Se, male, la labortempo necesa por produktado de tolo malkreskas al duono, ekzemple pro plibonigitaj teksiloj, tiam la valoro de tolo falas je duono. Laŭ tio nun: 20 ulnoj da tolo = ½ jako. La relativa valoro de la varo A, do ĝia valoro esprimita en la varo B, kreskas kaj falas do rekte kiel la valoro de la varo A, ĉe konstanta valoro de la valoro B.

II. La valoro de la tolo restu konstanta, dum la jakvaloro ŝanĝiĝu. Se en tiuj cirkonstancoj la labortempo necesa por produktado de la jako duobliĝas, ekzemple pro malfavora ŝaftondado, tiam ni havas anstataŭ 20 ulnoj da tolo = 1 jako nun: 20 ulnoj da tolo = ½ jako. Se, male, la valoro de la jako falas duone, tiam 20 ulnoj da tolo = 2 jakoj. Ĉe konstanta valoro de la varo A falas aŭ kreskas do ĝia relativa valoro esprimita en la varo B, en inversa rilato al la valorŝanĝo de B.

Se oni komparas la diversajn kazojn sub I kaj II, tiam rezultiĝas, ke la sama grandoŝanĝo de la relativa valoro povas fonti el tute kontraŭaj kaŭzoj. Tiel, el 20 ulnoj da tolo = 1 jako fariĝas: 1. la ekvacio 20 ulnoj da tolo = 2 jakoj, aŭ, ĉar la valoro de tolo duobliĝas aŭ la valoro de la jakoj duoniĝas, kaj 2. la ekvacio 20 ulnoj da tolo = ½ jako, aŭ ĉar la valoro de la tolo duoniĝas aŭ la valoro de la jako duobliĝas.

III. La laborkvantoj necesaj por produktado de tolo kaj de jako ŝanĝiĝu samtempe, en la sama direkto kaj la sama proporcio. En tiu kazo validas daŭre 20 ulnoj da tolo = 1 jako, kiom ajn ŝanĝiĝu iliaj valoroj. Oni malkovras ilian valorŝanĝon, ekde kiam oni komparas ilin kun tria varo, kies valoro restis senŝanĝa. Se la valoroj de ĉiuj varoj kreskis aŭ malkreskis samtempe kaj samproporcie, tiam iliaj relativaj valoroj restus senŝanĝaj. Oni rimarkus ilian realan valorŝanĝon el tio ke en la sama labortempo liveriĝus nun ĝenerale pli granda aŭ pli malgranda varkvanto ol antaŭe.

IV. La labortempoj necesaj respektive por produktado de tolo kaj jako, kaj do iliaj valoroj, ŝanĝiĝu samtempe en la sama direkto, sed en malsama grado, aŭ en kontraŭa direkto ktp. La influo de ĉiaj eblaj tiaj kombinaĵoj sur la relativan valoron de varo videblas simple per apliko de la kazoj I, II

28 La esprimo „valoro” estas uzata ĉi tie, kiel cetere jam antaŭe kelkloke, por kvante difinita valoro, do por valorgrando.

kaj III.

Realaj ŝanĝiĝoj de la valorgrando speguliĝas do nek senambigue nek elĉerpiĝe en sia relativa esprimo aŭ en la grando de la relativa valoro. La relativa valoro de varo povas ŝanĝiĝi, kvankam ĝia valoro restas konstanta. Ĝia relativa valoro povas resti konstanta, kvankam ĝia valoro ŝanĝiĝas, kaj fine tute ne nepras ke samtempaj ŝanĝoj de ĝia vargrando identu kun la relativa esprimo de tiu valorgrando.[29]

# 3. La ekvivalentformo

Ni vidis: Per tio, ke varo A (la tolo) esprimas sian valoron en la uzvaloro de diversspeca varo B (la jako), ĝi alpremas al tiu lasta mem siaspecan valorformon, tiun de la ekvivalento. La teksaĵa varo aperigas sian propran valor-eston per tio ke la jako, sen supozo de valorformo diversa de ĝia korpoformo, egalvaloras al ĝi. La tolo do esprimas efektive sian propran valor-eston per tio, ke la jako estas senpere interŝanĝebla kun ĝi. La ekvivalentformo de varo estas sekve la formo de ĝia senpera interŝanĝeblo kun alia varo.

Se varspeco, ekz-e jakoj, servas al alia varspeco, ekz-e tolo, kiel ekvivalento, jakoj pro tio ricevas la karakterizan econ troviĝi en senpere interŝanĝebla formo kun tolo, per tio estas neniel donita la proporcio laŭ

---

29 *Noto al la 2-a eld.*: Tiu malkongruo inter la valorgrando kaj ĝia relativa esprimo estis ekspluatata de la vulgarekonomio kun kutima sagaco. Ekz-e: „Fine koncedu, ke A falas, ĉar B, kun kiu ĝi estas interŝanĝata, falas, kvankam intertempe ne estas malpli da laboro elspezita por A, kaj via ĝenerala valorprincipo teren falas… Se oni koncedas, ke, ĉar la valoro de A relative al B kreskas, la valoro de B relative al A falas, la grundo estas fortranĉita sur kiun Ricardo starigas sian grandan teoremon, ke la valoro de varo estas ĉiam difinita de la kvanto da laboro enkorpigita en ĝin; ĉar se ŝanĝo en la kostoj de A ŝanĝas ne nur sian propran valoron en rilato al B, kun kiu ĝi estas interŝanĝata, sed ankaŭ la valoron de B relative al tiu de A, kvankam ne okazis ŝanĝo en la laborkvanto necesa por la produktado de B, tiam teren falas ne nur la doktrino, kiu asertas, ke la kvanto da laboro elspezita por artiklo regulas ties valoron, sed ankaŭ la doktrino, ka la produktokostoj de artiklo regulas ties valoron." (J. Broadhurst, „Political Economy", Londono, 1842, p. 11, 14.)

S-ro Broadhurst povintus same bone diri: Oni rigardu la nombrorilatojn 10/20, 10/50, 10/100 ktp. La nombro 10 restas senŝanĝa, kaj tamen ĝia proporcia grando, ĝia grando relative al la denominatoroj 20, 50, 100, konstante malkreskas. Do la granda principo falas teren, ke la grando de entjera nombro kiel ekz-e 10 estas „regulata" de la nombro da en ĝi entenataj unuj.

kiu jakoj kaj tolo interŝanĝeblas. Ĝi dependas, ĉar la valorgrando de tolo estas donita, de la valorgrando de la jakoj. Ĉu la jako estas esprimita kiel ekvivalento kaj la tolo kiel relativa valoro aŭ ĉu inverse la tolo kiel ekvivalento kaj la jako kiel relativa valoro, ĝia valorgrando restas difinita de la labortempo necesa por ĝia produktado, do sendepende de sia valorformo. Sed ekde kiam la varspeco jako en la valoresprimo alprenas la lokon de ekvivalento, ĝia valorgrando ne ricevas esprimon kiel valorgrando. Anstataŭ tio, ĝi aperas en la valorekvacio nur kiel certa kvanto de io.

Ekz-e: 40 ulnoj da tolo „valoras" – kion? 2 jakojn. Ĉar la varspeco jako ludas ĉi tie la rolon de ekvivalento, la uzvaloro jako validas fronte al la tolo kiel valorkorpo, sufiĉas ankaŭ certa kvanto da jakoj por esprimi certan valorkvanton da tolo. Du jakoj povas do esprimi la valorgrandon de 40 ulnoj da tolo, sed ili povas neniam esprimi sian propran valorgrandon, la valorgrandon de jakoj. La supraĵa kompreno de tiu fakto, ke la ekvivalento en la valorekvacio posedas nur la formon de simpla kvanto de io, de uzvaloro, misgvidis Bailey, kiel multajn el liaj antaŭuloj kaj posteuloj, vidi en la valoresprimo nur kvantan rilaton. La ekvivalentformo de varo entenas nenian kvantan valordifinon.

La unua aparteco, kiu okulfrapas ĉe rigardo al la ekvivalentformo, estas jena: uzvaloro fariĝas aperformo de sia kontraŭo, de valoro.

La naturformo de la varo fariĝas valorformo. Sed, notu bone, tiu unu-por-alia okazas por varo B (jako aŭ tritiko aŭ fero ktp) nur ene de la valorrilato, en kiu ia ajn alia varo A (tolo ktp) alpaŝas ĝin, nur ene de tiu rilato. Ĉar nenia varo povas rilati al si mem kiel ekvivalento, do ankaŭ ne povas fari sian naturan haŭton esprimo de sia propra valoro, ĝi devas rilati al alia varo kiel ekvivalento aŭ fari la naturan haŭton de alia varo sia propra valorformo.

Tion ilustru la ekzemplo de mezuro kiu taŭgas por la varkorpoj kiel varkorpoj, do kiel uzvaloroj. Funto da sukero, ĉar ĝi estas korpo, estas peza kaj do havas sian pezon, sed rigardante ĝin oni ne povas vidi aŭ palpi ĝian pezon. Ni prenu nun diversajn pecojn da fero, kies pezo estis antaŭe difinita. La korpa formo de la fero, konsiderata sole, estas same malmulte aperformo de la pezo kiel tiu de la funto da sukero. Tamen, por esprimi la sukeron kiel pezon, ni metas ĝin en pezrilaton kun la fero. En tiu rilato la fero validas kiel korpo kiu prezentas nenion alian ol pezon. Ferkvantoj servas pro tio kiel pezmezuro de la sukero kaj reprezentas fronte al la sukerkorpo nuran pezformon, aperformon de pezo. Tiun rolon ludas la fero nur ene de tiu rilato, en kiu la sukero aŭ ia ajn alia korpo,

kies pezo trovendas, alpaŝas ĝin. Se ambaŭ aĵoj ne pezus, tiam ili ne povus eniri tiun rilaton kaj la unua aĵo do ne servi kiel esprimo de la pezo de la alia. Se ni ĵetas ambaŭ sur la pesilon, tiam ni vidas efektive, ke kiel pezo ili estas la samo, kaj en certa proporcio ankaŭ sampezaj. Kiel la ferkorpo reprezentas kiel pezmezuro rilate al la sukero nur pezon, tiel en nia valoresprimo la jakkorpo reprezentas rilate la tolo nur valoron.

Sed ĉi tie jam ĉesas la analogio. La fero reprezentas en la pezesprimo de la sukero naturan econ komunan al ambaŭ korpoj, la pezon, dum la jako en la valoresprimo de la tolo reprezentas supernaturan econ de ambaŭ aĵoj: ilian valoron, ion pure socian.

Per tio ke la relativa valorformo de varo, ekz-e la tolo, esprimas sian valorecon kiel ion vere diversan de ĝia korpo kaj de ĝiaj ecoj, ekz-e kiel jaksamon, tiu esprimo indikas mem, ke ĝi entenas socian rilaton. Inverse la ekvivalentformo. Tiu konsistas ja ĝuste en tio, ke varkorpo, kiel la jako, tiu aĵo pendanta aŭ portata, esprimas valoron, posedas do elnature valorformon. Estas vere ke tio validas nur ene de la valorrilato, en kiu la tolo estas rilatigita al la jakvaro kiel ekvivalento.[30] Sed ĉar ecoj de aĵo ne fontas el siaj rilatoj al aliaj aĵoj, sed nur agas en tia rilato, ankaŭ la jako ŝajnas same posedi sian ekvivalentformon, sian econ de senpera interŝanĝeblo, de la naturo, kiel sian econ esti peza aŭ teni varmon. Pro tio la mistereco de la ekvivalentformo, kiu frapas la burĝe krudan rigardon de la politika ekonomikisto nur kiam tiu formo alpaŝas lin finite en mono. Tiam li provas forklarigi la misterecon de oro kaj arĝento substituante al ili malpli brilajn varojn kaj kun ĉiam denova plezuro gurdas la tutan katalogon de la varplebo kiu siatempe ludis la rolon de varekvivalento. Li neniel antaŭsupozas, ke jam en la plej simpla valoresprimo, kiel 20 ulnoj da tolo = 1 jako, troviĝas la solvo de la enigmo de la ekvivalentformo.

La korpo de varo, kiu servas kiel ekvivalento, konsideratas ĉiam kiel enkorpiĝo de abstrakta homa laboro kaj estas ĉiam la produkto de certa utila, konkreta laboro. Tiu konkreta laboro fariĝas do esprimo de abstrakta homa laboro. Se la jako ekz-e konsideratas kiel nura realigo [de abstrakta homa laboro], tiam la tajlorado, kiu fakte en ĝi realiĝas, kiel nura realigoformo de tiu abstrakta homa laboro. En la valoresprimo de la tolo konsistas la utileco de la tajlorado ne en tio, ke ĝi faras vestaĵojn, do

30 Tiaj refleksaj rilatoj estas entute aparta afero. Tiu homo estas ekz-e nur reĝo, ĉar aliaj homoj rilatas al li kiel subuloj. Ili kredas aliflanke esti subuloj, ĉar li estas reĝo.

ankaŭ homojn[31], sed ke ĝi faras korpon, ĉe kiu oni vidas ke ĝi estas valoro, do gelateno de laboro, kiu tute ne distingiĝas de tiu en la tolo konkretigita laboro. Por fari tian valorspegulon, la tajlorado mem devas speguli nenion alian ol sian abstraktan econ esti homa laboro.

En la formo de tajlorado kiel en la formo de teksado, homa laborforto estas elspezata. Ambaŭ posedas pro tio la ĝeneralan econ de homa laboro kaj povas pro tio en certaj okazoj, ekz-e ĉe la valorproduktado, esti konsiderataj nur sub tiu aspekto. Ĉio ĉi ne estas mistera. Sed en la valoresprimo de la varo tordiĝas la afero. Por ekz-e esprimi, ke la teksado faras la teksaĵan valoron ne en sia konkreta formo kiel teksado, sed en sia ĝenerala eco kiel homa laboro, oni kontraŭmetas al ĝi la tajloradon, la konkretan laboron kiu produktas la teksaĵ-ekvivalenton kiel la palpeblan formon de realigo de abstrakte homa laboro.

Estas do dua aparteco de la ekvivalentformo, ke konkreta laboro fariĝas aperformo de sia kontraŭo, de abstrakta homa laboro.

Sed dum tiu konkreta laboro, la tajlorado, estas konsiderata kiel nura esprimo de sendistinga homa laboro, ĝi posedas la formon de egaleco kun alia laboro, tiu troviĝanta en la tolo, kaj estas pro tio, kvankam privata laboro, tamen laboro en senpere socia formo. Ĝuste pro tio ĝi prezentiĝas en produkto, kiu estas senpere interŝanĝebla kun alia varo. Estas do tria aparteco de la ekvivalentformo, ke privata laboro fariĝas formo de sia kontraŭo, laboro en senpera socia formo.

La du laste disvolvitaj apartecoj de la ekvivalentformo fariĝas ankoraŭ pli palpeblaj, se ni retroiras al la granda esploristo, kiu la unua analizis la valorformon, kiel multajn aliajn pensformojn, sociajn formojn kaj naturformojn. Tiu estas Aristotelo.

Unue Aristotelo klare eldiras, ke la monformo de varo estas nur la pli evoluinta formo de la simpla valorformo, do de la esprimo de la valoro de varo en ia ajn alia varo, ĉar li diras:

„5 kusenoj = 1 domo”

Κλίναι πέντε ἀντὶ οἰκίας

[en la greka: Klinaj pente anti ojcias]

„ne distingiĝas” de:

„5 kusenoj = ia sumo da mono”

31 Aludo al la germana esprimo „vestaĵoj faras homojn” („*Kleider machen Leute*”), ankaŭ titolo de la fama novelo de Gottfried Keller. -vl

Κλίναι πέντε ἀντὶ … ὅσου αἱ πέντε κλίναι

[greke: klinaj pente anti … odson aj pente klinaj]

Li krome komprenas, ke la valorrilato, en kiu troviĝas tiu valoresprimo, siavice kondiĉas, ke la domo estas kvalite samigita al la kuseno kaj ke tiuj sense diversaj aĵoj sen tia esencosameco ne estus rilatigeblaj unu al la alia kiel komunmezuraj grandoj.

„La interŝanĝo”, diras li, „ne povas esti sen la sameco, sed la sameco ne sen la komunezureco”

„οὔτ' ἰσότης μὴ οὔσης συμμετρίας”
[greke: huth isotes me huses simetrias]

Sed ĉi tie li hezitas kaj forlasas la pluan analizadon de la valorformo.

„Sed envere maleblas

„τῇ μὲν οὖν ἀληθείᾳ ἀδύνατον“
[greke: te men un aletheia adinaton]

ke tiom diversaj aĵoj” estu „kunmezuraj”, do kvalite samaj.

Tiu samigo povas esti nur io fremda al la vera naturo de la aĵoj, do nur „improviza rimedo por la praktika bezono”.

Aristotelo do diras mem al ni, ĉe kio fiaskas lia plua analizo, nome ĉe la manko de la valornocio. Kio estas la samo, do la komuna substanco, kiu prezentas la domon por la kuseno en la valoresprimo de la kuseno? Io tia povas „envere ne ekzisti”, diras Aristotelo. Kial? La domo prezentas fronte al la kuseno ion saman, en la mezuro laŭ kiu ĝi prezentas vere la samon en la kuseno kaj en la domo. Kaj tio estas – homa laboro.

Sed ke en la formo de la varvaloroj ĉiuj laboroj estas esprimataj kiel sama homa laboro kaj pro tio kiel samvaloraj, tion Aristotelo ne povis ellegi el la valorformo mem, ĉar la greka socio baziĝis sur sklavlaboro, pro tio ĝi havis la malsamecon de la homoj kaj de iliaj laborfortoj kiel naturan bazon. La sekreto de la valoresprimo, la sameco kaj sama valideco de ĉiuj laboroj, ĉar kaj en la mezuro en kiu ili entute estas homa laboro, elĉifreblas nur, ekde kiam la nocio de homa sameco posedas jam la firmecon de popola konvinko. Sed tio eblas nur en socio, en kiu la varformo estas la ĝenerala formo de laborprodukto, do ankaŭ la rilato de la homoj inter si kiel varposedantoj estas la reganta socia rilato. La genio de Aristotelo brilas ĝuste en tio, ke li malkovras en la valoresprimo de la varoj samecrilaton. Nur la historia baro de la socio, en kiu li vivis, mal-

ebligis al li eltrovi en kio „envere” konsistas tiu samecrilato.

# 4. La tutaĵo de la simpla valorformo

La simpla valorformo de varo estas entenata en sia valorrilato al diversspeca varo aŭ en la interŝanĝrilato kun ĝi. La valoro de la varo A estas kvalite esprimata per la senpera interŝanĝeblo de la varo B kun la varo A. Ĝi estas kvalite esprimata per la interŝanĝeblo de certa kvanto de la varo B kun la donita kvanto de la varo A. Per aliaj vortoj: La valoro de varo estas memstare esprimata per sia prezentado kiel „interŝanĝvaloro”. Se en la komenco de tiu ĉi ĉapitro estis dirite en la kutima maniero: La varo estas uzvaloro kaj interŝanĝvaloro, tio estis, en preciza diro, malĝusta. La varo estas uzvaloro aŭ uzobjekto kaj „valoro”. Ĝi prezentiĝas kiel tiu duobla, kio ĝi estas, ekde kiam ĝia valoro posedas propran, de sia naturformo diversa aperformo, tiun de la interŝanĝvaloro, kaj ĝi posedas tiun formon neniam en izolita konsidero, sed ĉiam nur en la valor- aŭ interŝanĝ-rilato al dua, diversspeca varo. Sed ekde kiam oni tion scias, tiu dirmaniero ne malutilas, sed servas kiel mallongigo.

Nia analizo pruvis, ke la valorformo aŭ la valoresprimo de varo fontas el la naturo de la varvaloro, ne inverse valoro kaj valorgrando el ĝia esprimmaniero kiel interŝanĝvaloro. Sed tio estas la iluzio de la merkantilistoj kaj iliaj modernaj revarmigantoj kiel Ferrier, Ganilh ktp[32] kiel ankaŭ de iliaj antipodoj, la modernaj liberkomerc-reprezentistoj, kiel Bastiat kaj lia koterio. La merkantilistoj emfazas la kvalitan flankon de la valoresprimo, pro tio la ekvivalentformon de varo, kiu posedas en la mono sian finitan formon – aliflanke la modernaj liberkomerc-kolportistoj, kiuj devas ĉiapreze forvendi sian varon, la kvantan flankon de la relativa valorformo. Por ili sekve ekzistas nek valoro nek valorgrando de la varo krom en la esprimo per la interŝanĝrilato, pro tio nur en la slipo de la ĉiutaga preztabelo. La skoto Macleod, en sia funkcio kiom eble plej klere aspektigi la absolute konfuzajn ideojn de *Lombardstreet*[33], reprezentas la sukcesan sintezon inter la superstiĉaj merkantilistoj kaj la kleraj liberkomerc-kolportistoj.

---

32 *Noto al la 2-a eld.:* F.L.A. Ferrier (sous-inspecteur des douanes [subinspektisto de dogano]), „Du Gouvernement considéré dans ses rapports avec le commerce”, Parizo 1805, kaj Charles Ganilh, „Des Systèmes d'Économie Politique”, 2ème éd., Parizo 1821.

33 Walter Bagehot: „Lombard Street: A Description of the Money Market”, Londono, 1873. -vl

La pli detala rigardo de la valoresprimo de la varo A entenata en la valorrilato al la varo B montras, ke ene de tiu la naturformo de la varo A validas nur kiel formo de uzvaloro, la naturformo de la varo B nur kiel valorformo aŭ valorkorpo. La interna kontraŭeco de uzvaloro kaj valoro, envolvita en la varo estas do prezentata per ekstera kontraŭeco, do per la rilato de du varoj, ĉe kio unu varo, *kies* valoro esprimendas, estas konsiderata nur kiel uzvaloro, sed la alia varo, *en kiu* valoro estas esprimata, rekte nur kiel valoro. La simpla valorformo de varo estas do la simpla en ĝi entenata aperformo de la kontraŭeco de uzvaloro kaj valoro.

La laborprodukto estas en ĉiuj sociaj statoj uzobjekto, sed nur historie difinita evoluepoko, kiu prezentas la laboron elspezitan en la produktado de uzobjekto kiel ties „konkretan” econ, do kiel ĝian valoron, transformas la laborprodukton en varon. El tio do sekvas, ke la simpla valorformo de la varo estas samtempe la simpla varformo de la laborprodukto, ke do ankaŭ la evoluo de la varformo kongruas kun la evoluo de la valorformo.

La unua rigardo montras la nesufiĉecon de la simpla valorformo, de tiu ĝerma formo, kiu nur per sinsekvo da metamorfozoj maturiĝas al la prezformo.

La esprimo en ia ajn varo B distingas la valoron de la varo A nur disde ties propra uzvaloro kaj pro tio ankaŭ nur metas ĝin en interŝanĝrilaton al ia ajn unuopa de ĝi mem diversa varspeco, anstataŭ prezenti ĝian kvalitan samecon kaj kvantan proporciecon kun ĉiaj aliaj varoj. Al la simpla relativa valorformo de varo respondas la individua ekvivalentformo de alia varo. Tiel la jako, en la relativa valoresprimo de la tolo, posedas nur ekvivalentformon aŭ formon de senpera interŝanĝeblo kun rilato al tiu individua varspeco tolo.

Sed la unuopa valorformo transiras mem en pli kompletan formon. Pere de tiu, la valoro de varo A estas esprimata ja en nur unu alispeca varo. Sed kia estas tiu dua varo, ĉu jako, ĉu fero, ĉu tritiko ktp, estas tute egale. Do, laŭ tio ĉu ĝi eniras en valorrilaton al tiu ĉi aŭ al tiu alia varspeco, estiĝas diversaj simplaj valoresprimoj de unu sama varo. [34] La nombro da ĝiaj eblaj valoresprimoj estas limigita nur per la nombro da varspecoj diversaj de ĝi. Ĝia unuopa valoresprimo pro tio transformiĝas en la ĉiam longigeblan vicon da ĝiaj diversaj simplaj valoresprimoj.

34 *Noto al la 2-a eld.:* Ekz-e ĉe Homero la valoro de aĵo esprimiĝas per aro da diversaj aĵoj.

## *B) Totala aŭ disvolvita valorformo*

z varo A = u varo B aŭ = v varo C aŭ w varo D aŭ x varo E aŭ ktp.

(20 ulnoj da tolo = 1 jako aŭ = 10 funtoj da teo aŭ 40 funtoj da kafo aŭ = 1 kvarto da tritiko aŭ 2 uncoj da oro aŭ $^1/_2$ tuno da fero aŭ = ktp.)

# 1. La disvolvita relativa valorformo

La valoro de varo, ekz-e de la tolo, estas nun esprimata per sennombraj aliaj elementoj de la varmondo. Ĉiu alia varkorpo fariĝas spegulo de la teksaĵ-valoro.[35] Tiel, tiu valoro aperas mem nur vere kiel gelateno de sendistinga homa laboro. Ĉar la ĝin faranta laboro estas nun prezentata eksplicite kiel laboro, kiu valoras same kiel ĉia alia homa laboro, kian ajn naturformon ĝi posedas aŭ ĉu ĝi konkretiĝas do en jako aŭ tritiko aŭ fero aŭ oro ktp. Per sia valorformo la tolo staras do nun ankaŭ en socia rilato jam ne nur al unu individua alia varspeco, sed al la varmondo. Kiel varo ĝi estas civitano de tiu ĉi mondo. Samtempe, en la senfina vico de ĝiaj esprimoj kuŝas la fakto ke la varvaloro estas indiferenta kontraŭ ĉia aparta formo de la uzvaloro en kiu ĝi aperas.

En la unua formo: 20 ulnoj da tolo = 1 jako, povas esti hazarda fakto ke tiuj du varoj interŝanĝeblas en certa kvanta proporcio. En la dua formo, male, tra la hazarda aperaĵo tuj trabrilas fono esence malsama de ĝi kaj kiu difinas ĝin. La valoro de la tolo restas same granda, ĉu prezentata en jako aŭ kafo aŭ fero ktp, en sennombraj varoj, apartenantaj al la plej diversaj posedantoj. La hazarda rilato de du individuaj varposedantoj

35 Pro tio oni parolas pri la jakvaloro de la tolo, kiam oni prezentas ĝian valoron en jakoj, pri cerealvaloro, kiam oni prezentas ĝin en cerealo ktp. Ĉiu tia esprimo diras ke estas ĝia valoro kiu aperas en la uzvaloroj jako, cerealo ktp. „Ĉar la valoro de ĉiuj varoj signas ĝian proporcion en interŝanĝo, ni povas nomi ĝin … cerealvaloro, ŝtofvaloro, laŭ la varo kun kiu ĝi estas komparata; kaj pro tio ekzistas miloj da diversaj specoj de valoroj, tiom kiom ekzistas varoj, kaj ĉiuj estas same realaj kaj same nominalaj.” („A Critical Dissertation on the Nature, Measures, and Causes of Value; chiefly in reference to the writings of Mr. Ricardo and his followers. By the Author of Essays on the Formation etc. of Opinions”, Londono 1825, p. 39.) S. Bailey, la verkinto de tiu anonima skribaĵo, kiu siatempe kaŭzis multan bruon en Anglio, supozis, per tiu indiko al la pelmelaj relativaj esprimoj de la sama varvaloro, esti neniiginta ĉian difinon de valoro. Ke li cetere, malgraŭ sia spirita malvasteco, detektis vundajn makulojn de la teorio de Ricardo, tion pruvis la incitiĝo per kiu la Rikarda skolo agresis lin, ekz-e en la Westminster Review.

forfalas. Evidentiĝas ke ne la interŝanĝo reguligas la valorgrandon de la varo, sed inverse la valorgrando de la varo reguligas ĝiajn interŝanĝrilatojn.

## 2. La aparta ekvivalentformo

Ĉiu varo, jako, teo, tritiko, fero ktp, estas konsiderata en la valoresprimo de la tolo kiel ekvivalento kaj pro tio kiel valorkorpo. La aparta naturformo de ĉiu el tiaj varoj estas nun aparta ekvivalentformo apud multaj aliaj. Same la diversaj apartaj, konkretaj, utilaj laborspecoj, entenataj en la diversaj varkorpoj, estas nun konsiderataj kiel same multaj apartaj realigo – aŭ aper-formoj de homa laboro ĝenerale.

## 3. Mankoj de la totala aŭ disvolvita valorformo

Unue, la relativa valoresprimo de la varo estas nekompleta, ĉar ĝia prezentvico neniam finiĝas. La ĉeno, per kiu unu valorekvacio aldoniĝas al la alia, restas konstante plilongigebla per ĉia nove aperanta varspeco, kiu liveras la materialon de nova valoresprimo. Due ĝi konsistas el bunta mozaiko de disaj kaj diversspecaj valoresprimoj. Se fine, kiel devas okazi, la relativa valoro de ĉiu varo esprimiĝas en tiu disvolvita formo, tiam la relativa valorformo de ĉiu varo estas senfina vico da valoresprimoj, diversa de la relativa valorformo de ĉiu alia varo. – La mankoj de la disvolvita relativa valorformo speguliĝas en la ekvivalentformo kiu respondas al ĝi. Ĉar la naturformo de ĉiu individua varspeco estas ĉi tie aparta ekvivalentformo apud sennombraj aliaj apartaj ekvivalentformoj, ekzistas entute nur limigitaj ekvivalentformoj, el kiuj ĉiu ekskludas la alian. Same la aparta, konkreta, utila laborspeco, entenata en ĉiu aparta varekvivalento, estas nur aparta, do ne ĝisdetale kompleta aperformo de la homa laboro. Tiu posedas sian kompletan aŭ totalan aperformon ja en la tuta perimetro de tiuj apartaj aperformoj. Sed tiel ĝi ne posedas unuecan aperformon.

Sed la disvolvita relativa valorformo konsistas nur el sumo de simplaj relativaj valoresprimoj aŭ ekvacioj de la unua formo, kiel:

20 ulnoj da tolo = 1 jako

20 ulnoj da tolo = 10 funtoj da teo ktp.

Ĉiu tia ekvacio entenas tamen retroaktive ankaŭ la identan ekvacion:

1 jako = 20 ulnoj da tolo

10 funtoj da teo = 20 ulnoj da tolo ktp.

Efektive: Se iu interŝanĝas sian tolon kontraŭ multaj aliaj varoj kaj pro tio esprimas ĝian valoron per vico de aliaj varoj, tiam ankaŭ la aliaj varposedantoj devas nepre interŝanĝi sian varon kontraŭ tolo kaj do esprimi la valorojn de siaj diversaj varoj en la sama tria varo, en tolo. – Ni do inversu la vicon: 20 ulnoj da tolo = 1 jako aŭ = 10 funtoj da teo aŭ = ktp, do, se ni esprimas la aferon per la retroaktivo jam entenata en la vico, ni ricevas:

### C) Ĝenerala valorformo

1 jako =

10 funtoj da teo =

40 funtoj da kafo =

1 kvarto da tritiko = } 20 ulnoj da tolo

2 uncoj da oro =

$^{1}/_{2}$ tuno da fero =

x varoj A =

ktp varo =

## 1. Ŝanĝita karaktero de la valorformo

La varoj prezentas siajn valorojn nun 1. simple, ĉar en unu sola varo kaj 2. unuece, ĉar en la sama varo. Ilia valorformo estas simpla kaj komuna, pro tio ĝenerala.

La formoj I kaj II sukcesis nur esprimi la valoron de varo kiel ion diversan de ĝia uzvaloro aŭ de ĝia varkorpo.

La unua formo rezultigis valorekvaciojn kiel: 1 jako = 20 ulnoj da tolo, 10 funtoj da teo = $^{1}/_{2}$ tuno da fero ktp. La jakvaloro estas esprimata kiel io teksaĵsama, la tevaloro kiel io fersama ktp, sed teksaĵsamo kaj fersamo, tiuj valoresprimoj de jako kaj teo, estas same diversaj kiel tolo kaj fero. Tiu formo ekzistis evidente nur en la unuaj komencoj, kiam laborproduktoj transformiĝas al varoj per hazarda kaj laŭokaza interŝanĝo.

La dua formo distingas pli komplete ol la unua la valoron de varo de ĝia propra uzvaloro, ĉar la valoro de la jako ekz-e alpaŝas nun sian naturformon en ĉiaj eblaj formoj, kiel teksaĵsamo, fersamo, tesamo ktp, ĉio alia, nur ne jaksamo. Aliflanke ĉi tie ĉia komuna valoresprimo de la varoj estas rekte ekskludita, ĉar en la valoresprimo de ĉiu individua varo aperas nun ĉiuj aliaj varoj nur en la formo de ekvivalentoj. La disvolvita valorformo aperas unue efektive, ekde kiam laborprodukto, ekz-e bruto, estas ne nur esceptokaze, sed jam kutime interŝanĝata kun aliaj varoj.

La nove akirita formo esprimas la valorojn de la varmondo en unu kaj sama de ĝi apartigita varspeco, ekz-e en tolo, kaj tiel prezentas la valoron de ĉiuj varoj per ilia sameco kun tolo. Kiel teksaĵsamo la valoro estas nun esprimata ne nur diverse de ĝia propra uzvaloro, sed de ĉia uzvaloro, kaj ĝuste per tio ĝi estas esprimata kiel la samo kun ĉiuj varoj. Pro tio, nur tiu formo rilatigas vere la varojn inter si kiel valoroj aŭ aperigas ilin kiel interŝanĝvalorojn.

La du antaŭaj formoj esprimas la valoron de ĉiu unuopa varo, ĉu en unu sola diversspeca varo, ĉu en multaj varoj diversaj de ĝi. Ambaŭfoje estas, por tiel diri, la privata afero de ĉiu aparta varo doni al si valorformon, kaj ĝi plenumas tion sen interveno de aliaj varoj. Tiuj ludas fronte al ĝi la nur pasivan rolon de ekvivalento. La ĝenerala valorformo estiĝas, aliflanke, nur kiel komuna verko de la varmondo. Varo akiras nur ĝeneralan valoresprimon, ĉar samtempe ĉiuj aliaj varoj esprimas sian valoron en la sama ekvivalento, kaj ĉiu nove aperanta varo devas tion imiti. Per tio aperas la fakto, ke la valorkonkreteco de la varoj, ĉar ĝi estas la nur „socia esto” de tiuj aĵoj, esprimeblas ankaŭ nur per sia ĉiuflanka socia rilato, ke ilia valorformo devas do esti socie valida formo.

En la formo de teksaĵsamoj aperas nun ĉiuj varoj ne nur kiel kvalite samaj, valoroj entute, sed samtempe kiel kvante kompareblaj valorgrandoj. Ĉar ili spegulas siajn valorgrandojn en unu sama materialo, en tolo, tiuj valorgrandoj speguliĝas reciproke. Ekz-e 10 funtoj da teo = 20 ulnoj da tolo, kaj 40 funtoj da kafo = 20 ulnoj da toloj. Do 10 funtoj da teo = 40 funtoj da kafo. Aŭ en 1 funto da kafo kuŝas nur $^1/_4$ da valorsubstanco, da laboro kiel en 1 funto da teo.

La ĝenerala relativa valorformo de la varmondo stampas al la ekvivalentvaro, ekskludita de ĝi, la tolo, la karakteron de ĝenerala ekvivalento. Ĝia propra naturformo estas la komuna valorformo de tiu ĉi mondo, la tolo pro tio rekte interŝanĝeblas kun ĉiuj aliaj varoj. Ĝia korpa formo konsideratas kiel la videbla enkarniĝo, la ĝenerala socia pupiĝo de ĉia

homa laboro. La teksado, la privata laboro, kiu produktas tolon, troviĝas samtempe en ĝenerale socia formo, la formo de sameco kun ĉiuj aliaj laboroj. La sennombraj ekvacioj, el kiuj konsistas la ĝenerala valorformo, egaligas laŭvice la laboron realigitan en la tolo kun ĉia laboro entenata en alia varo kaj per tio faras la teksadon la ĝenerala aperformo de homa laboro entute. Tial la laboro entenata en la varvaloro estas ne nur prezentata negative kiel laboro de kiu oni abstraktas ĉiujn konkretajn formojn kaj utilajn ecojn de la realaj laboroj. Ĝia propra pozitiva naturo aperas eksplicite. Ĝi estas la reduktiĝo de ĉiuj realaj laboroj al la karaktero de homa laboro komuna al ili, al la elspezo de homa laborforto.

La ĝenerala valorformo, kiu prezentas la laborproduktojn kiel nurajn gelatenojn de sendistinga homa laboro, montras per sia propra strukturo, ke ĝi estas la socia esprimo de la varmondo. Tiel ĝi malkaŝas ke ene de tiu varmondo la ĝenerale homa karaktero de la laboro konsistigas ĝian specife socian karakteron.

# 2. Evolurilato de relativa valorformo kaj ekvivalentformo

Al la evolugrado de la relativa valorformo respondas la evolugrado de la ekvivalentformo. Sed, kaj tio notindas, la evoluo de la ekvivalentformo estas nur esprimo kaj rezulto de la evoluo de la relativa valorformo.

La simpla aŭ okaza relativa valorformo de varo faras alian varon okaza ekvivalento. La disvolvita formo de la relativa valoro, tiu esprimo de la valoro de varo en ĉiuj aliaj varoj, stampas al ili la formon de diversspecaj apartaj ekvivalentoj. Fine, aparta varspeco ricevas la ĝeneralan ekvivalentformon, ĉar ĉiuj aliaj varoj faras ilin la materialo de sia unueca, ĝenerala valorformo.

Sed en la sama grado, laŭ kiu la valorformo evoluas entute, evoluas ankaŭ la kontraŭdiro inter iliaj du polusoj, la relativa valorformo kaj la ekvivalentformo.

Jam la unua formo – 20 ulnoj da tolo = 1 jako – entenas tiun kontraŭdiron, sed ne fiksas ĝin. Laŭ tio, ĉu la sama ekvacio estas legata antaŭen aŭ malantaŭen, ĉiu de la du varekstremoj, kiel tolo kaj jako, troviĝas jen en la relativa valorformo, jen en la ekvivalentformo. Ĉi tie kostas ankoraŭ penadon reteni la polusan kontraŭecon.

En la formo II ĉiufoje nur unu varspeco povas totale disvolvi sian

relativan valoron aŭ posedas mem nur disvolvitan relativan valorformon, ĉar kaj kondiĉe ke ĉiuj aliaj varoj troviĝas kontraŭ ĝi en la ekvivalentformo. Ĉi tie jam ne eblas inversigi la du flankojn de la valorekvacio – kiel 20 ulnoj da tolo = 1 jako aŭ = 10 funtoj da teo aŭ = 2 kvartoj da tritiko ktp –, sen ŝanĝi ĝian entutan karakteron kaj transformi ĝin el la totala en la ĝeneralan valorformon.

La lasta formo, formo III, fine donas al la varmondo ĝeneralsocian relativan valorformon, ĉar kaj kondiĉe ke, kun unu sola escepto, ĉiuj al ĝi apartenantaj varoj estas ekskluditaj el la ĝenerala ekvivalentformo. Varo, kiel tolo, troviĝas do en la formo de senpera interŝanĝeblo kun ĉiuj aliaj varoj aŭ en rekte socia formo, ĉar kaj kondiĉe ke ĉiuj aliaj varoj ne troviĝas en ĝi.[36]

Inverse, varo kiu ludas la rolon de ĝenerala ekvivalento, estas ekskludita el la unueca kaj pro tio ĝenerala relativa valorformo. Se la tolo, do ia ajn varo troviĝanta en ĝenerala ekvivalentformo, partoprenas samtempe en la ĝenerala relativa valorformo, tiam ĝi devus servi mem por si kiel ekvivalento. Tiam ni ricevus: 20 ulnoj da tolo = 20 ulnoj da tolo, taŭtologio, en kiu esprimiĝas nek valoro nek valorgrando. Por esprimi la relativan valoron de la ĝenerala ekvivalento, ni devas inversigi la formon III. Ĝi posedas nenian kun la aliaj varoj komunan relativan valorformon, sed ĝia valoro esprimiĝas relative el la senfina vico de ĉiuj aliaj varkorpoj. Tiel la

36 Oni efektive ne vidas ĉe la formo de ĝenerala senpera interŝanĝeblo, ke ĝi estas kontraŭeca varformo, nedisigebla disde la formo de ne senpera interŝanĝeblo same kiel la pozitiveco de unu magnetpoluso de la negativeco de la alia. Oni povas pro tio iluzii ke oni povas al ĉiuj varoj doni samtempe la stampon de senpera interŝanĝeblo, kiel oni povas iluzii, ke oni povas ĉiujn katolikojn fari papoj. Por la etburĝo, kiu en la varproduktado vidas la pinton de homa libereco kaj de individua sendependeco, estus kompreneble tre dezirinde esti senigita je la mankoj ligitaj kun tiu formo, nome ankaŭ je la ne senpera interŝanĝeblo de la varoj. La elpentrado de tiu filistra filozofio faras la socialismon de Prudono, kiu, kiel mi montris aliloke [Karlo Markso: Mizero de la filozofio. Respondo al la filozofio de la mizero de s-ro Prudono", elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 197 paĝoj, 16 eŭroj, ISBN 978-2-918300-08-3, (franca eld.: Karl Marx: „Misère de la philosophie. Réponse à la philosophie de la misère de M. Proudhon", Parizo, Bruselo 1874, ĉap. 1; vd vol. 4, p. 67-124)], posedas eĉ ne la meriton de originaleco, kaj estis longan tempon antaŭ li multe pli bone disvolvita de Gray, Bray kaj aliaj. Tio ne malhelpas tian saĝon, hodiaŭ, en certaj rondoj, furori sub la nomo de „science" [scienco]. Neniam skolo pli ol la prudona misuzis la vorton „scienco", ĉar „kie mankas la nocioj, aperas vort' en ĝusta temp'".

disvolvita relativa valorformo aŭ formo II aperas nun kiel la specifa relativa valorformo de la ekvivalentvaro.

## 3. Transiro el ĝenerala valorformo al monformo

La ĝenerala ekvivalentformo estas formo de la valoro entute. Ĝi atribueblas do al ĉiu varo. Aliflanke varo troviĝas en ĝenerala ekvivalentformo (formo III) nur, ĉar kaj kondiĉe ke ĝi estas de ĉiuj aliaj varoj ekskludita kiel ekvivalento. Kaj nur ekde la momento, en kiu tiu ekskludo limiĝas definitive al unu specifa varspeco, la unueca relativa valorformo de la varmondo akiris objektivan firmecon kaj ĝenerale socian validecon.

La specifa varspeco, kun kies naturformo la ekvivalentformo socie kunfandiĝas, fariĝas monvaro aŭ funkcias kiel mono. Tiu fariĝas ĝia specife socia funkcio, kaj pro tio ĝia socia monopolo, ludi ene de la varmondo la rolon de ĝenerala ekvivalento. Tiun privilegian lokon historie konkeris inter la varoj, kiuj en la formo II funkciis kiel apartaj ekvivalentoj de la tolo kaj en la formo III esprimas sian relativan valoron komune en tolo, certa varo, la oro. Se ni pro tio en la formo III metas la varon oro en la lokon de la varo tolo, ni ricevas:

### *Ĉ) Monformo*

| | |
|---|---|
| 20 ulnoj da tolo = | |
| 1 jako = | |
| 10 funtoj da teo = | |
| 40 funtoj da kafo = | } 2 uncoj da oro |
| 1 kvarto da tritiko = | |
| $^{1}/_{2}$ tuno da fero = | |
| x varo A = | |

Okazas gravaj ŝanĝoj ĉe la transiro de formo I al formo II, de formo II al formo III. Male, la formo IV distingiĝas neniel de la formo III, krom ke, anstataŭ tolo, nun oro posedas la ĝeneralan ekvivalentformon. Oro

restas en la formo IV tio kio tolo estis en la formo III – ĝenerala ekvivalento. La progreso konsistas nur en tio, ke la formo de senpera ĝenerala interŝanĝeblo aŭ la ĝenerala ekvivalentformo estas nun per la socia kutimo definitive kunkreskinta kun la specifa naturformo de la varo oro.

Oro alpaŝas la aliajn varojn kiel mono nur ĉar ĝi jam staris kontraŭ la aliaj varoj kiel varo. Same kiel ĉiuj aliaj varoj, ankaŭ ĝi funkciis kiel ekvivalento, ĉu kiel okaza ekvivalento en okazaj interŝanĝ-agoj, ĉu kiel aparta ekvivalento apud aliaj varekvivalentoj. Iom post iom ĝi funkciis en pli striktaj aŭ pli vastaj rondoj kiel ĝenerala ekvivalento. Ekde kiam ĝi konkeris la monopolon de tiu loko en la valoresprimo de la varmondo, ĝi fariĝas monvaro, kaj nur ekde la momento en kiu ĝi jam fariĝis monvaro, la formo IV distingiĝas de la formo III, aŭ la ĝenerala valorformo estas ŝanĝita en la monformon.

La simpla relativa valoresprimo de varo, ekz-e de tolo, en la jam kiel monvaro ekzistanta varo, ekz-e oro, estas prezformo. La „prezformo" de la tolo estas do:

20 ulnoj da tolo = 2 uncoj da oro

aŭ, se 2 sterlingaj pundoj estas la monernomo de 2 uncoj da oro,

20 ulnoj da tolo = 2 sterlingaj pundoj

La malfacilo en la nocio de monformo limiĝas al la kompreno de la ĝenerala ekvivalentformo, do de la ĝenerala valorformo entute, de la formo III. Formo III solviĝas retroaktive en formon II, la disvolvita valorformo, kaj ĝia konsistiga elemento estas formo I: 20 ulnoj da tolo = 1 jako aŭ x varo A = y varo B. La simpla varformo estas do la ĝermo de la monformo.

## 1.4. La fetiĉeco de la varo kaj ĝia sekreto

Varo ŝajnas esti unuavide memkomprenebla, triviala aĵo. Ĝia analizo rezultigas, ke ĝi estas tre komplika aĵo, plena de metafizika subtilaĵo kaj teologiaj kapricoj. Tiom longe kiom ĝi estas uzvaloro, ĝi havas nenian misteran, ĉu mi rigardas ĝin el la vidpunkto ke ĝi kontentigas per siaj ecoj homajn bezonojn aŭ ĉu ĝi ricevas tiujn ecojn nur kiel produkto de homa laboro. Estas palpeble klare, ke la homo per sia agado ŝanĝas la formojn de la naturmaterialoj en maniero al li utila. La formo de ligno ekz-e estas ŝanĝata, se oni faras el ĝi tablon. Tamen la tablo restas ligno, ordinara konkretaĵo. Sed ekde kiam ĝi aperas kiel varo, ĝi transformiĝas en sens-

eblan supersensan aĵon. Ĝi staras ne nur per siaj piedoj sur la planko, sed ĝi starigas sin kontraŭ ĉiuj aliaj varoj sur la kapon kaj disvolvas el sia ligna kapo kapricojn, multe pli mirigajn ol se ĝi komencus meminiciate danci.[37]

La mistikeco de la varo fontas do ne el ĝia uzvaloro. Ĝi fontas ankaŭ ne el la enhavo de la valordeterminadoj. Ĉar unue, kiom ajn diversaj estas la utilaj laboroj aŭ produktivaj agadoj, estas fiziologia vero, ke ili estas funkcioj de la homa organismo kaj ke ĉiu tia funkcio, kia ajn estas ĝia enhavo kaj ĝia formo, estas esence elspezo de homa cerbo, nervo, muskolo, sensorgano ktp. Kio due estas la bazo de la determinado de la valorgrando, la daŭro de tia elspezo aŭ la kvanto de la laboro, tiu kvanto estas eĉ percepteble distingebla de la kvalito de la laboro. En ĉiuj cirkonstancoj la labortempo, kiun kostas la produktado de la vivrimedoj, devis interesi la homojn, kvankam ne same sur ĉiuj evoluŝtupoj.[38] Fine, ekde kiam la homoj iel laboras unu por la alia reciproke, laboro ricevas ankaŭ socian formon.

Kie do fontas la enigmeco de la laborprodukto, ekde kiam ĝi alprenas la varformon? Evidente el tiu formo mem. La sameco de la homaj laboroj ricevas la objektivan formon de sama valorkonkreteco de la laborproduktoj, la mezuro de elspezo de homa laborforto per ĝia daŭro ricevas la formon de valorgrando de la laborproduktoj, fine la rilatoj de la produktantoj, en kiu tiuj sociaj difinoj de iliaj laboroj estas aktivataj, ricevas la formon de socia rilato de la laborproduktoj.

La mistereco de la varformo konsistas do simple en tio, ke tiu ĉi respegulas al la homoj la sociajn karakterojn de ilia propra laboro kiel konkretaĵojn de la laborproduktoj mem, kiel sociajn naturkvalitojn de tiuj aĵoj, pro tio ankaŭ la socian rilaton de la produktantoj al la ĉiomlaboro kiel socian rilaton de objektoj ekzistantan ekster ili. Per tiu unu-por-alia, la laborproduktoj fariĝas varoj, percepteble transcendaj”[39] aŭ sociaj aĵoj.

---

37 Oni memoru, ke Ĉinio kaj la tabloj komencis danci, kiam la tuta cetera mondo ŝajnis senmoviĝi – pour encourager les autres [por kuraĝigi la aliajn].

38 *Noto al la 2-a eld.:* Ĉe la antikvaj ĝermanoj la grando de akreo da tero estis kalkulata laŭ la laboro de unu tago kaj pro tio la akreo nomata taglaboro (ankaŭ Tagwanne) (jurnale aŭ jurnalis, terra jurnalis, jornalis aŭ diurnalis), virlaboro, virforto, virfalĉo, virhako ktp. Vidu Georg Ludwig von Maurer, „Einleitung zur Geschichte der Mark-, Hof-, usw. Verfassung”, Munkeno 1854, p. 129 s.

39 *En la originalo: „sinnlich übersinnliche … Dinge”*, laŭvorte: sensaj supersensecaj … aĵoj. -vl

Tiel la lumimpreso de aĵo sur la vidnervo prezentiĝas ne kiel subjektiva ekscitiĝo de la vidnervo mem, sed kiel konkreta formo de aĵo ekster la okulo. Sed ĉe vidado vere ĵetiĝas lumo de aĵo, la ekstera objekto, al alia aĵo, la okulo. Estas fizika rilato inter fizikaj aĵoj. Male, la varformo kaj la valorrilato de la laborproduktoj, en kiu ĝi prezentas sin, havas absolute nenion komunan kun sia fizika naturo kaj kun la el ĝi fontantaj konkretaj rilatoj. Ĝi estas nur la difinita socia rilato de la homoj mem, kiu ĉi tie alprenas la fantasmagorian formon de rilato de aĵoj. Do, por trovi analogaĵon, ni devas fuĝi en la nebulan regionon de la religia mondo. Tie la produktoj de la homa kapo ŝajnas esti memstaraj figuroj dotitaj je vivo kaj en rilato inter si kaj kun la homoj. Tiel en la varmondo la produktoj de la homa mano. Tion mi nomas la fetiĉeco, kiu gluiĝas ĉe la laborproduktoj ekde kiam ili produktiĝas kiel varoj kaj kiu pro tio estas nedisigebla de la varproduktado.

Tiu fetiĉeco de la varmondo fontas, kiel montris jam la antaŭa analizo, el la siaspeca socieco[40] de la laboro kiu produktas varojn.

Ĝenerale, uzobjektoj fariĝas varoj nur ĉar ili estas produktoj de privataj laboroj faritaj sendepende unu de la aliaj. La tuta komplekso de tiuj privataj laboroj konsistigas la socian ĉiomlaboron. Ĉar la produktantoj eniras socian kontakton nur per la interŝanĝo de siaj laborproduktoj, ankaŭ la specife sociaj karakteroj de iliaj privataj laboroj aperas nur ene de tiu interŝanĝo. Alivorte la privataj laboroj agas efektive kiel membroj de la socia ĉiomlaboro nur per la rilatoj, en kiujn la interŝanĝo de la laborproduktoj metas la laborproduktojn kaj pere de tiuj la produktantojn. Al tiuj ĉi la sociaj rilatoj de iliaj privataj laboroj pro tio aperas kiel tio kio ili estas, do ne kiel rektaj sociaj rilatoj de la personoj en ties laboroj mem, sed pli ĝuste kiel objektorientitaj rilatoj de la personoj kaj sociaj rilatoj de la aĵoj.

Nur ene de la interŝanĝo la laborproduktoj ricevas socie saman valorobjektecon disigitan de sia konkrete diversa uzobjekteco. Tiu dispartiĝo de la laborprodukto en utilan aĵon kaj valoraĵon praktikiĝas nur ekde kiam la interŝanĝo akiris jam sufiĉan amplekson kaj gravecon por ke produktiĝu utilaĵoj por interŝanĝo, do ke la valoreco de la aĵoj konsideratas jam ĉe ilia produktado mem. Ekde tiu momento la privataj laboroj de la produktantoj ricevas efektive duoblan sociecon. Ili devas unuflanke kiel certaj utilaj laboroj kontentigi certan socian bezonon kaj tiel pruviĝi taŭgaj kiel membroj de la ĉiomlaboro, de la sponteca sistemo de la socia labordivido. Aliflanke ili kontentigas la diversajn bezonojn de sia propraj

40 *Laŭvorte:* socia karaktero. -vl

produktantoj nur kondiĉe ke ĉiu aparta utila privatlaboro interŝanĝeblas kun ĉiu alia utila speco de privatlaboro, do ke ĝi estas konsiderata kiel sama kun ĝi. La sameco de tute diversaj laboroj povas ekzisti nur per abstraktado de ilia reala malegaleco, per redukto al la komuneco kiun ili posedas kiel elspezo de homa laborforto, de abstrakta homa laboro. La cerbo de la privataj produktantoj spegulas tiun duoblan sociecon de iliaj privatlaboroj nur en la formoj kiuj aperas en la praktika cirkulado, en la produktinterŝanĝo – la socian utilecon de iliaj privatlaboroj do en la formo ke la laborprodukto devas esti utila, kaj pli precize utila por aliuloj – la sociecon de la sameco de la diversspecaj laboroj en la formo de la komuna valoreco de tiuj materie diversaj aĵoj, de la laborproduktoj.

La homoj do rilatigas siajn laborproduktojn unu al la alia kiel valorojn, ne ĉar ili konsideras tiujn aĵojn kiel nur aĵajn ŝelojn de samspeca homa laboro. Inverse. Per tio ke ili samigas siajn diversajn produktojn unu al la alia en la interŝanĝo kiel valorojn, ili samigas siajn diversajn laborojn unu al la aliaj kiel homan laboron. Ili ne scias tion, sed ili faras tion.[41] Pro tio, la valoro ne portas sur sia frunto skribite kio ĝi estas. La valoro, male, transformas ĉian laborprodukton en socian hieroglifon. Poste la homoj provas deĉifri la sencon de la hieroglifo, malkovri la sekreton de sia propra socia produkto, ĉar la destinado de la uzobjektoj kiel valoroj estas ilia socia produkto same kiel la lingvo. La malfrua scienca malkovro, ke laborproduktoj, kondiĉe ke ili estas valoroj, estas nur konkretaj esprimoj de la homa laboro elspezita en ilia produktado, estas epokfara en la evoluhistorio de la homaro, sed ĝi tute ne forigas la ŝajnon kvazaŭ la socieco de la laboro estus eco de la produktoj. Kio validas nur por tiu aparta produktadformo, la varproduktado, nome ke la specifa socieco de la privatlaboroj sendependaj unu de la alia konsistas en sia sameco kiel homa laboro kaj alprenas la formon de valoreco de la laborproduktoj, ŝajnas, antaŭ kaj post tiu malkovro, al la homoj implikitaj en la rilatoj de varproduktado, esti same definitiva kiel la aero, kiu post la scienca malkovro de ĝiaj ĥemiaj elementoj, restas plu sama en sia natura konsisto.

Tio, kio une interesas la produktinterŝanĝantojn praktike, estas la demando, kiom da fremdaj produktoj ili ricevas por la propra produkto, en kiuj proporcioj do la produktoj interŝanĝiĝas. Ekde kiam tiuj proporcioj maturiĝis al certa kutima firmeco, ili ŝajnas fonti el la naturo de la

41 *Noto al la 2-a eld.:* Do, se Galiani diras: La valoro estas rilato inter personoj – „La Riccezza è una ragione tra due persone” –, li devintus aldoni: rilato kaŝita sub aĵa ŝelo. (Galiani, „Della Moneta”, p. 221, v. III de la Kolektaĵo de Custodi de la „Scrittori Classici Italiani di Economia Politica”, Parte Moderna, Milano 1803.).

laborproduktoj, tiel ke ekz-e tuno da fero kaj 2 uncoj da oro estas samvaloraj, kiel funto da oro kaj funto da fero estas sampezaj, malgraŭ iliaj diversaj fizikaj kaj ĥemiaj ecoj. Efektive la valoreco de la laborproduktoj firmiĝas nur per ilia funkciado kiel valorgrandoj. Tiuj ŝanĝiĝas konstante, sendepende de la volo, antaŭscio kaj agado de la interŝanĝantoj. Ilia propra socia moviĝo posedas por ili la formon de moviĝo de aĵoj, sub kies kontrolo ili estas, anstataŭ kontroli ilin. Necesas komplete disvolvita varproduktado, antaŭ ol el la sperto mem elkreskas la scienca kompreno, ke la privatlaboroj, sendepende faritaj unu de la alia, sed kiel naturaj membroj de la socia labordivido ĉiuflanke dependaj unu de la alia, estas konstante reduktataj al sia socie proporcia mezuro, ĉar en la hazardaj kaj konstante ŝanceliĝantaj interŝanĝrilatoj de iliaj produktoj nepre trudiĝas la por ilia produktado necesa labortempo kiel reguliga naturleĝo, kiel ekz-e la leĝo pri gravito trudiĝas al tiu sur kies kapon la domo disfalas. La determinado de la valorgrando per la labortempo estas do sekreto kaŝita sub la ŝajnantaj moviĝoj de la relativa varvaloro. Ĝia malkovro forigas la ŝajnon de la nur hazarda determinado de la valorgrandoj de la laborproduktoj, sed tute ne ĝian konkretan formon[42].

La pensado pri la formoj de la homa vivo, do ankaŭ ilia scienca analizado, iras vojon tute kontraŭan al la reala evoluo. Ĝi komenciĝas postokaze kaj pro tio per la pretaj rezultoj de la evoluprocezo. La formoj, kiuj stampas laborproduktojn kiel varojn kaj kiuj estas do antaŭkondiĉaj por varproduktado, posedas jam la firmecon de naturformoj de la socia vivo, antaŭ ol la homoj provas konscii, ne pri la historieco de tiuj formoj, kiuj al ili ŝajnas jam neŝanĝeblaj, sed pri ilia enhavo. Tiel nur la analizo de la varprezoj kondukis al la difino de la valorgrando, nur la komuna monesprimo de la varoj kondukis al la fiksado de ilia valoreco. Sed estas ĝuste tiu preta formo – la monformo – de la varmondo, kiu vualas la sociecon de la privatlaboroj kaj pro tio la sociajn rilatojn de la privatlaboristoj, anstataŭ malkaŝi ilin. Se mi diras ke jako, botoj ktp rilatas al tolo kiel al ĝenerala enkorpiĝo de abstrakta homa laboro, tiam la frenezeco de tiu esprimo okulfrapas. Sed kiam la produktantoj de jako, botoj ktp rilatigas tiujn varojn al tolo – aŭ al oro kaj arĝento, kio neniom ŝanĝas la aferon – kiel al komuna ekvivalento, tiam la rilato de iliaj privatlaboroj al la socia ĉiomlaboro aperas al ili en precize tiu freneza formo.

Tiaj formoj konsistigas ĝuste la kategoriojn de la burĝa ekonomio. Ili estas socie validaj, do objektivaj pensformoj por la produktadkondiĉoj de

42 *Variaĵo en la franca eldono:* … sed tute ne la formon kiu reprezentas tiun valorgrandon kiel grandecrilaton inter la aĵoj, inter la laborproduktoj mem. -vl

tiu historie determinita socia produktadmaniero, de la varproduktado. Ĉia mistiko de la varmondo, ĉia sorĉo kaj fantomo, kiu mense nebuligas laborproduktojn surbaze de varproduktado, pro tio tuj malaperas, ekde kiam ni konsideras aliajn produktadformojn.

Ĉar la politika ekonomio ŝatas robinsonaĵojn[43], aperu unue Robinsono sur sia insulo. Modesta, kiel li estas de origine, li devas tamen kontentigi diversajn bezonojn kaj devas pro tio plenumi diversspecajn utilajn laborojn, fari ilojn, fabriki meblojn, malsovaĝigi lamaojn, fiŝkapti, ĉasi ktp. Ni ne parolu pri preĝado kaj similaj, ĉar nia Robinsono trovas ĉe tio sian plezuron kaj konsideras tiajn farojn kiel distriĝon. Malgraŭ la diverseco de liaj produktivaj funkcioj li scias, ke ili estas nur diversaj agadformoj de la sama Robinsono, do nur diversaj manieroj de homa laboro. La urĝo mem devigas lin precize dividi sian tempon inter siaj diversaj funkcioj. Ĉu unu okupas pli, la alia malpli da spaco en lia ĉiomagado, dependas de la pli granda aŭ pli malgranda malfacilo superenda por atingo de la celata util-efiko. La sperto instruas al li tion, kaj nia Robinsono, kiu savis horloĝon, ĉeflibron, inkon kaj plumon el la ŝiprompiĝo, komencas baldaŭ kiel bona anglo librotenadi pri si mem. Lia inventarlibro entenas liston de la uzobjektoj, kiujn li posedas, de la diversaj faroj necesaj por ilia produktado, fine de la labortempo kiun kostas al li certaj kvantoj de tiuj diversaj produktoj mezume. Ĉiuj rilatoj inter Robinsono kaj la aĵoj kiuj konsistigas lian memkreitan riĉaĵon, estas ĉi tie tiom simplaj kaj travideblaj, ke eĉ s-ro Wirth devus kompreni ilin sen aparta mensstreĉado. Kaj tamen ĉiuj esencaj difinoj de la valoro estas en ili entenataj.

Ni transiĝu nun el la helluma Robinsona insulo en la malluman eŭropan mezepokon. Anstataŭ la sendependa viro ni trovas nun ĉiun homon dependa – servutulojn kaj senjoron, vasalon kaj feŭdestron, laikulojn kaj pastrojn. Persona dependeco karakterizas la sociajn rilatojn de la materia produktado same kiel la vivsferojn bazitajn sur ili. Sed ĝuste ĉar personaj dependecoj konsistigas la donitan socian bazon, laboroj kaj produktoj ne bezonas alpreni fantastan formon diversan de ilia realeco. Ili eniras kiel naturaĵservoj kaj naturaĵplenumoj en la socian radaron. La naturformo de

43 *Noto al la 2-a eldono:* Ankaŭ Ricardo ne estas sen sia robinsonaĵo. „La prafiŝiston kaj la praĉasiston li igas tuj interŝanĝi fiŝon kaj ĉasaĵon kiel varposedanto, en proporcio de la labortempo konkretigita en tiuj interŝanĝvaloroj. Ĉe tiu okazo li falas en la anakronismon ke prafiŝisto kaj praĉasisto por kalkulado de siaj laborinstrumentoj konsultas la anuitattabelojn kiuj estis en 1817 kurantaj ĉe la Londona borso. La 'paralelogramoj de s-ro Oveno' ŝajnas esti la sola sociformo krom la burĝa kiun li konis." (Karl Marx: „Zur Kritik ktp", p. 38, 39. [Vidu MEW, vol. 13, p. 46].

la laboro, ĝia specifeco, kaj ne, kiel surbaze de la varproduktado, ĝia ĝeneraleco, estas ĉi tie ĝia senpere socia formo. La servutlaboro estas same mezurata laŭ la tempo kiel la varproduktanta laboro, sed ĉiu servutulo scias, ke estas certa kvanto da lia persona laborforto kiun li elspezas en la servo al sia senjoro. La dekonaĵo liverenda al la pastro estas pli klara ol la beno de la pastro. Kiel ajn oni prijuĝas la karaktermaskojn en kiuj la homoj ĉi tie alpaŝas sin reciproke, la sociaj rilatoj de la personoj en siaj laboroj aperas ĉiukaze kiel iliaj personaj rilatoj kaj ne estas maskitaj en sociaj rilatoj de la aĵoj, de la laborproduktoj.

Por la analizo de komuna, t.e. senpere sociigita laboro ni ne bezonas retroiri ĝis ĝia natura formo, kiun ni renkontas ĉe la historia sojlo de ĉiuj kulturpopoloj.[44] Pli proksima ekzemplo estas la kamparane patriarĥa industrio de kampula familio, kiu produktas por la propraj bezonoj grenon, brutaron, fadenon, tolon, vestaĵojn ktp. Tiuj diversaj aĵoj alpaŝas la familion kiel diversaj produktoj de ĝia familia laboro, sed ne al si mem reciproke kiel varoj. La diversaj laboroj, kiuj kreas tiujn produktojn, terkulturado, brutbredado, ŝpinado, teksado, tajlorado ktp estas en sia naturformo sociaj funkcioj, ĉar funkcioj de la familio, kiu posedas sian propran, naturecan labordividon same kiel la varproduktado. Diferencoj de sekso kaj de aĝo kaj la naturkondiĉoj de la laboro ŝanĝiĝantaj kun la sezonoj reguligas ĝian dividadon en la familio kaj la labortempon de la individuaj familianoj. Sed la elspezo de la individuaj laborfortoj, mezurataj per la daŭro, aperas ĉi tie deorigine kiel socia determinado de la laboroj mem, ĉar la individuaj laborfortoj efikas deorigine nur kiel organoj de la komuna laborforto de la familio.

Ni imagu fine, por iom ŝanĝi, asocion de liberaj homoj, kiuj laboras per kolektivaj produktadrimedoj kaj kiuj disvolvas siajn multnombrajn individuajn laborfortojn plenkonscie pri tio kion ili faras, kiel unu granda socia laborforto. Ĉiuj difinoj de la Robinsona laboro ripetiĝas ĉi tie, sed socie anstataŭ individue. Ĉiuj produktoj de Robinsono estis lia ekskluzive

44 *Noto al la 2-a eldono:* „Estas ridinda antaŭjuĝo disvastigita en la lasta tempo, ke la formoj de la natura komunproprieto estas specifa, eĉ ekskludе rusa formo. Ĝi estas la praformo, kiun ni povas pruvi ĉe la romianoj, ĝermanoj, keltoj, sed de kiu troviĝas daŭre tuta kolektaĵo kun diversaj specimenoj, kvankam parte nur ruinece, ĉe la hindoj. Pli detala studado de la aziaj, speciale de la hindaj komunproprietaj formoj pruvus, kiel el la diversaj formoj de la natura komunproprieto rezultiĝas diversaj formoj de ĝia likvidado. Tiel deriveblas ekz-e la diversaj originaltipoj de la romia kaj ĝermana privatproprieto el diversaj formoj de la hinda komunproprieto.” (Karl Marx: „Zur Kritik ktp”, p. 10 [Vidu MEW, vol. 13, p. 21]

persona produkto kaj pro tio senpere uzobjektoj por li. La ĉiomprodukto de asocio estas socia produkto. Parto de tiu produkto servas ree kiel produktadrimedo. Ĝi restas socia. Sed alia parto konsumiĝas de la asocianoj kiel vivrimedo. Ĝi estas do distribuenda inter ili. La maniero de tiu distribuado certe ŝanĝiĝas kun la aparta maniero de la socia produktadorganismo mem kaj de la tiurilata historia evoluŝtupo de la produktantoj. Nur por paralelo al la varproduktado ni supozu ke la parto de ĉiu produktanto je la vivrimedoj estu determinata laŭ lia labortempo. La labortempo ludus do duoblan rolon. Ĝia socie laŭplana distribuado reguligas la ĝustan proporcion de la diversaj laborfunkcioj al la diversaj bezonoj. Aliflanke la labortempo servas samtempe kiel mezuro de la individua parto de la produktanto je la komunlaboro kaj pro tio ankaŭ je la individue konsumebla parto de la komunprodukto. La sociaj rilatoj de la homoj al siaj laboroj kaj al siaj laborproduktoj restas ĉi tie travideble simplaj en la produktado same kiel en la distribuado.

Por socio de varproduktantoj, kies ĝenerala socia produktadrilato konsistas en tio, konduti al siaj produktoj kiel al varoj, do valoroj, kaj en tiu konkreta formo rilatigi siajn privatlaborojn unu al la alia kiel al sama homa laboro, la kristanismo kun sia kulto al la abstrakta homo, nome en sia burĝa evoluo, la protestantismo, deismo ktp, estas la plej kongrua religia formo.[45] En la praazia, antikva ktp produktadmanieroj la transformado de la produkto al varo, kaj pro tio la ekzistado de la homoj kiel varproduktantoj, ludas subordigitan rolon, kiu fariĝas tamen des pli grava, ju pli la kolektiveco eniras la stadion de sia pereo. Vere komercaj popoloj ekzistas nur en la intermondoj de la antikva mondo, kiel la dioj de Epikuro aŭ kiel judoj en la poroj de la pola socio. Tiuj malnovaj sociaj produktadorganismoj estas ege pli simplaj kaj travideblaj ol la burĝa, sed ili baziĝas aŭ sur la nematureco de la individua homo, kiu ankoraŭ ne tranĉis sian umbilikan ŝnuron kiu ligis lin kun natura triba kunteksto kun aliaj, aŭ sur rilatoj de rekta subigo[46]. Ili estas karakterizitaj de malalta evoluŝtupo de la produktadfortoj de la laboro kaj laŭ tio de limigitaj rilatoj de la homoj ene de ties procezo de materia vivproduktado, same inter si kiel al la naturo.

Tiu reala limiteco speguliĝas idee en la malnovaj natur- kaj popolreligioj. La religia rebrilo de la reala mondo povas entute nur malaperi, ekde kiam la kondiĉoj de la praktika labortaga vivo prezentas al la homoj

45 *En la franca eldono*, tiu ĉi paragrafo komenciĝas per: „La religia mondo estas nur la reflekto de la reala mondo." -vl

46 *En la franca eldono:* … aŭ sur rilatoj de despotismo kaj sklavismo." -vl

ĉiutage travideble raciajn rilatojn inter ili kaj al la naturo. La formo de la socia vivprocezo, t.e. de la materia produktadprocezo, demetas sian mistikan vualon nur ekde kiam ĝi estas kiel produkto de libere sociiĝintaj homoj sub ties konscia laŭplana kontrolado. Sed por tio necesas materia bazo de la socio aŭ aro da materiaj ekzistadkondiĉoj, kiuj siavice estas la natura produkto de longa kaj turmenta evoluhistorio.

La politika ekonomio ja analizis, kvankam nekomplete[47], valoron kaj valorgrandon kaj malkovris la enhavon kaŝitan en tiuj formoj. Ĝi ankaŭ neniam eĉ nur starigis la demandon, kial tiu enhavo alprenas tiun formon, kial do la laboro prezentiĝas en la valoro kaj la mezuro de la laboro per ĝia daŭro en la valorgrando de la laborprodukto.[48] Formoj, kiuj mem

47 La nesufiĉeco en la analizo de Ricardo pri la valorgrando – kaj tiu estas la plej bona – videblas en la tria kaj kvara libro de tiu ĉi verko. Sed koncerne la valoron entute, la klasika politika ekonomio nenie distingas eksplicite kaj kun klara konscio la laboron, kiu prezentiĝas en la valoro, disde la laboro kiu prezentiĝas en la uzvaloro de sia produkto. Ĝi faras tiun distingon kompreneble fakte, ĉar ĝi konsideras la laboron jen kvante, jen kvalite. Sed al ĝi ne venas la ideo, ke nur kvanta diferenco de la laboroj antaŭkondiĉas ilian kvalitan unuecon aŭ samecon, do ilian reduktadon al abstrakta homa laboro. Ricardo ekz-e deklaras sin konsenta kun Destutt de Tracy, kiam tiu diras: *„Ĉar certas ke niaj korpaj kaj mensaj kapabloj estas sole nia origina riĉaĵo, la uzado de tiuj kapabloj, certa speco de laboro, estas nia origina trezoro; estas ĉiam tiu uzado, kiu kreas ĉiujn ĉi aĵojn kiujn ni nomas riĉaĵo … Krome certas ke ĉiuj ĉi aĵoj prezentas nur la laboron kiu kreis ilin, kaj se ili havas valoron, aŭ eĉ du diversajn valorojn, tiam ili povas havi tion ja nur el la* (valoro) *de la laboro, el kiu ili fontas."* (Ricardo, „The principles of Pol. Econ.", 3-a eld., Londono, 1821, p. 334. [Kp Destutt de Tracy, „Elemens d'ideologie", IV[e] et V[e] parties, Parizo 1826, p. 35, 36.] Ni aludas nur ke Ricardo imputas al Destutt sian propran pli profundan sencon. Destutt diras fakte ja unuflanke, ke ĉiuj aĵoj kiuj konsistigas la riĉaĵon „reprezentas la laboron, kiu ilin kreis", sed aliflanke, ke ili ricevas siajn *„du diversajn valorojn"* (uzvaloron kaj interŝanĝvaloron) de la *„valoro de la laboro"*. Li falas per tio en la supraĵecon de la vulgarekonomio, kiu antaŭkondiĉas la valoron de varo (ĉi tie de la laboro), por per tio poste difini la valoron de la aliaj varoj. Ricardo legas lin tiel ke kaj en la uzvaloro kaj en la interŝanĝvaloro prezentiĝas laboro (ne valoro de la laboro). Sed li mem tiom malmulte distingas la duspecan karakteron de la laboro, kiu estas duoble prezentata, ke li en la tuta ĉapitro „Value and Riches, their Distinctive Properties" [„Valoro kaj riĉaĵo, iliaj distingaj trajtoj"] devas pene lukti kun la trivialaĵoj de J. B. Say. Ĉe la fino li estas pro tio tute mirigita ke Destutt harmonias kun li mem ja pri laboro kiel valorfonto kaj tamen aliflanke kun Say pri la valornocio.

48 Estas unu el la ĉefaj mankoj de la klasika politika ekonomio, ke ĝi neniam sukcesis eltrovi el la analizo de la varo kaj pli speciale de la varvaloro la

afiŝas ke ili apartenas al sociformacio en kiu la produktadprocezo mastras la homojn, la homo ankoraŭ ne la produktadprocezon, estas konsiderataj de ilia burĝa konscio kiel same memkomprenebla naturnepreco kiel la produkta laboro mem. Ili do pritraktas antaŭburĝajn formojn de la socia produktadorganismo en la maniero kiel ekzemple ekleziaj patroj pritraktas antaŭkristanajn religiojn.[49]

Kiom parto de la ekonomikistoj estas trompataj de la imanenta fetiĉeco de la varmondo aŭ de la materieca ŝajno de la sociaj laboratribuadoj, tion pruvas i.a. la enue banala disputaĉo pri la rolo de la naturo en la estiĝo de

---

formon de la valoro kiu faras ĝin interŝanĝvaloro. Ĝuste en ĝiaj plej bonaj reprezentantoj, kiel A. Smith kaj Ricardo, ĝi pritraktas la valorformon kiel ion tute indiferentan aŭ ion tute eksteran al la naturo de la varo. La kaŭzo estas ne nur ke la analizo de la valorgrando tute sorbas ilian atenton. Ĝi kuŝas pli profunde. La valorformo de la laborprodukto estas la plej abstrakta, sed ankaŭ plej ĝenerala formo de la burĝa produktadmaniero, kiu per tio karakteriziĝas kiel aparta maniero de socia produktado kaj per tio karakteriziĝas samtempe historie. Pro tio, se oni misinterpretas ĝin kiel eternan naturformon de socia produktado, tiam oni nepre pretervidas ankaŭ la specifaĵon de la valorformo, do de la varformo, de la pli evoluinta monformo, kapitalformo ktp. Oni trovas pro tio ĉe ekonomikistoj, kiuj tute konsentas pri la mezurado de la valorgrando per la labortempo, la plej ĥaosajn kaj plej kontraŭdirajn imagojn pri mono, t.e. de la finita formo de la ĝenerala ekvivalento. Tio aperas okulfrape ekz-e ĉe la pritraktado de la banksistemo, ĉe kio jam ne sufiĉas la trivialaj difinoj de la mono. Kontraste aperis pro tio restaŭrita merkantilsistemo (Ganilh ktp), kiu vidas en la valoro nur la socian formon aŭ pli ĝuste nur ĝian sensubstancan ŝajnon. – Por mencii tion unu fojon por ĉiam, mi komprenas sub klasika politika ekonomio ĉian ekonomion ekde W. Petty, kiu esploras la internan kunteniĝon de la burĝaj produktadkondiĉoj, kontraste al la vulgarekonomio, kiu vagadas nur ene de la ŝajna kunteniĝo, ĉiam denove remaĉas la materialon liveritan de la scienca ekonomio por komprenebla klarigo de la por tiel diri plej krudaj fenomenoj kaj por la burĝa hejmbezono, sed cetere limiĝas sistemigi kaj pedantigi la banalajn kaj orgojlajn ideojn de la burĝaj produktadagentoj pri ilia propra plej bona mondo, kaj proklami ilin kiel eternajn verojn.

49 „La ekonomikistoj procedas strange. Por ili ekzistas nur du specoj de institucioj, artefaritaj kaj naturaj. La institucioj de la feŭdismo estas artefaritaj institucioj, tiuj de la burĝaro naturaj. En tio ili similas al la teologoj, kiuj ankaŭ distingas du specojn de religioj. Ĉiu religio kiu ne estas la ilia, estas inventaĵo de la homoj, dum ilia propra religio estas revelacio de dio. – Tiel do ekzistis historio, sed jam neniu ekzistas.” [Karlo Markso: „Mizero de la filozofio. Respondo al la Filozofio de la Mizero de s-ro Prudono”, trad. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-08-3, p. 134. -vl] [La unua franclingva eldono: Karl Marx: „Misère de la Philosophie. Réponse à la Philosophie de la Misère de M. Proudhon”, 1847, p. 113.

la interŝanĝvaloro. Ĉar interŝanĝvaloro estas certa socia maniero esprimi la laboron aplikitan al aĵo, ĝi jam ne povas enteni pli da natura substanco ol ekz-e la interŝanĝa kurzo.

Ĉar la varformo estas la plej ĝenerala kaj plej nedisvolvita formo de la burĝa produktado, pro kio ĝi aperas frue, kvankam ne en la sama reganta, do karakteriza maniero kiel nuntempe, ĝia fetiĉeco ŝajnas esti ankoraŭ relative facile travidebla. Ĉe pli konkretaj formoj eĉ tiu ŝajno de simpleco malaperas. De kie la iluzioj de la monsistemo[50]? Tiu ne vidis ĉe la oro kaj arĝento ke ili kiel mono prezentas socian produktadrilaton, sed en formo de naturaĵoj kun strange sociaj ecoj. Kaj la moderna ekonomiko, kiu distingite ridaĉas pri la monsistemo, ĉu ne evidentiĝas ĝia fetiĉismo, ekde kiam ĝi pritraktas la kapitalon? De kiom da tempo malaperis la fizio-

[Vd vol. 4, p. 139])] Vere amuza estas s-ro Bastiat, kiu imagas ke la antikvaj grekoj kaj romianoj vivis nur per rabado. Sed se oni vivas multajn jarcentojn per rabado, tiam devas esti do konstante ekzisti io rabebla aŭ la rabaĵo devas konstante reproduktiĝi. Ŝajnas do, ke ankaŭ grekoj kaj romianoj havis produktadprocezon, do ekonomion, kiu konsistigis tute same la materian bazon de ilia mondo kiel la burĝa ekonomio tiun de la hodiaŭa mondo. Aŭ ĉu Bastiat eble opinias, ke produktadmaniero kiu baziĝas sur sklavlaboro, baziĝas sur rabsistemo? Tiam li metas sin sur danĝeran grundon. Se pensgiganto kiel Aristotelo eraris en sia omaĝo al la sklavlaboro, kial nan-ekonomikisto kiel Bastiat ĝustus en sia omaĝo al la dunglaboro? – Mi kaptas tiun okazon por mallonge refuti kontraŭargumenton kiun faris german-usona gazeto 1859 ĉe la apero de mia verko „Zur Kritik de Politischen Oekonomie [Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio]”. Ĝi diris, ke mia opinio, ke la difinita produktadmaniero kaj la al ĝi kongruaj produktadkondiĉoj, mallonge „la ekonomia strukturo de la socio estas la reala bazo, sur kiu leviĝas jura kaj politika superstrukturo kaj al kiu respondas certaj sociaj konsci-formoj”, ke „la produktadmaniero de la materia vivo entute antaŭkondiĉas la socian, politikan kaj spiritan vivprocezon” [vidu MEW, vol. 13, p. 8/9], – ĉio ĉi estas ja ĝusta por la hodiaŭa mondo, kie regas la materiaj interesoj, sed nek por la mezepoko, kie regis la katolikismo, nek por Ateno aŭ Romo, kie regis la politiko. Unue estas strange, ke iu kapricas supozi ke iu ne konas tiujn mondkonatajn dirojn pri mezepoko kaj antikva mondo. Klaras, ke la mezepoko ne povis vivi de katolikismo kaj la antikva mondo ne de la politko. La maniero laŭ kiu ili gajnis sian vivon, klarigas inverse, kial tie la politiko, ĉi tie la katolikismo ludis la ĉefan rolon. Cetere ne necesas multe da kono pri ekz-e la historio de la roma respubliko por scii ke la historio de la terproprieto konsistigas ĝian sekretan historion. Aliflanke jam Donkiĥoto viktimiĝis pro la eraro ke li iluziis la vagantan kavaliraron same akordiĝema kun ĉiuj ekonomiaj formoj de la socio.

50 *Originale:* „… des Monetarsystems?”, en la franca eld.: „… du système mercantile?” [de la merkantilsistemo]. -vl

kratisma iluzio ke la grundrento elkreskas el la tero, ne el la socio?

Tamen por ne anticipi, sufiĉu ĉi tie ankoraŭ ekzemplo pri la varformo mem. Se la varoj povus paroli, ili dirus: nia uzvaloro povas interesi la homon. Ĝi ne apartenas al ni kiel aĵoj. Sed kio apartenas al ni kiel aĵoj, estas nia valoro. Nia propra cirkulado kiel varaĵoj pruvas tion. Ni rilatigas nin inter ni nur kiel interŝanĝvaloroj. Oni aŭdu nun, kiel la ekonomikisto parolas el la varanimo:

> „Valoro” (interŝanĝvaloro) „estas eco de la aĵoj, riĉaĵo” (uzvaloro) „de la homo. Valoro en tiu senco inkludas nepre interŝanĝon, riĉaĵo ne.”[51] „Riĉaĵo” (uzvaloro) „estas atributo de la homo, valoro atributo de la varoj. Homo aŭ komunumo estas riĉa; perlo aŭ diamanto estas altvalora … Perlo aŭ diamanto havas valoron kiel perlo aŭ diamanto.”[52]

Ĝis nun nenia ĥemiisto malkovris interŝanĝvaloron en perlo aŭ diamanto. Sed la ekonomiaj malkovrintoj de tiu ĥemia substanco, kiuj pretendas apartan kritikan profundecon, trovas, ke la uzvaloro de la aĵoj apartenas al ili sendepende de iliaj aĵaj kvalitoj, sed ke male ilia valoro apartenas al ili kiel al aĵoj. Kio certigas ilin ĉe tio, estas la stranga cirkonstanco ke la uzvaloro de la aĵoj realiĝas por la homo sen interŝanĝo, do en senpera rilato inter aĵo kaj homo, ilia valoro inverse nur per interŝanĝo, t.e. en socia procezo. Kiu ne memoras ĉi tie la bonan Dogberry, kiu instruas la noktgardiston Seacoal:

> „Esti bonaspekta viro estas doto de la cirkonstancoj, sed povi legi kaj skribi venas de la naturo.”[53]

---

51 „Value is a proprerty of things, riches of man, in this sense, necessarily implies exchange, riches do not.” („Observations on some verbal disputes in Pol. Econ., particularly relating to value, and to supply and demand”, Londono 1821, p. 16.)

52 „Riches ar the attribute of man, value is the attribute of commodities. A man or a community is rich, a pearl or a diamond is valuable … A pearl or a diamond is valuable as a pearl or diamond.” (S. Bailey, l.c., p. 165 s.)

53 La aŭtoro de la „Observations” kaj S. Bailey kulpigas Ricardo-n ke li transformis la interŝanĝvaloron el io nur relativa en ion absolutan. Inverse. Li reduktis la ŝajnrealecon, kiun posedas tiuj aĵoj, diamanto kaj perloj ekz-e kiel interŝanĝvaloroj, al la vera rilato kaŝita malantaŭ la ŝajno, al ilia relativeco kiel nuraj esprimoj de homa laboro. Kiam la Ricardo-istoj respondas al Bailey maldelikate, sed ne trafe, tiam nur ĉar ili ĉe Ricardo mem ne trovis klarigon pri la interna kunteniĝo inter valoro kaj valorformo aŭ interŝanĝvaloro.

## *DUA ĈAPITRO – La interŝanĝprocezo*

La varoj ne povas mem iri al la bazaro kaj interŝanĝi sin mem. Ni devas do serĉi iliajn gardistojn, la varposedantojn. La varoj estas aĵoj kaj pro tio senrezistaj kontraŭ la homo. Se ili ne emas, li povas uzi perforton, alivorte, preni ilin.[54] Por rilatigi tiujn aĵojn unu al la alia kiel varojn, la vargardistoj devas konduti unu al la alia kiel personoj kies volo loĝas en tiuj aĵoj, tiel ke iu nur kun la volo de la alia, do ĉiu nur per vola ago komuna al ambaŭ alproprigas al si la fremdan varon, per tio ke li cedas ĝin. Ili devas do reciproke agnoski sin kiel privatproprietuloj. Tiu jura rilato, kies formo estas la kontrakto, ĉu leĝe disvolvita aŭ ne, estas volrilato en kiu speguliĝas la ekonomia rilato. La enhavo de tiu jura aŭ vola rilato estas donita de la ekonomia rilato mem.[55] La personoj ekzistas ĉi tie unu por la alia nur kiel reprezentantoj de varo kaj pro tio kiel varposedantoj. Ni trovos entute en la daŭrigo de la disvolviĝo, ke la ekonomiaj karaktermaskoj de la personoj estas nur la personiĝoj de la ekonomiaj rilatoj kies portantoj ili estas kaj kiel tiaj ili alpaŝas unu la alian.

Tio kio distingas la varposedanton de la varo estas la cirkonstanco ke al ĝi ĉiu alia varkorpo aperas nur kiel aperformo de ĝia propra valoro. Kiel ĝisosta cinikulo ĝi do konstante pretas kun ĉia alia varo, eĉ se tiu estas provizita per pli da malagrablaĵoj ol Maritorne, interŝanĝi ne nur la ani-

---

54 En la 12-a jarcento, tiel fifama pro sia pieco, troviĝas inter tiuj varoj ofte tre delikataj aĵoj. Ekz-e tiutempa franca verkisto nombras inter la varoj, kiuj alvenis sur la bazaro de Landit, apud vestaĵaj, ŝtofoj, ŝuoj, ledo, terkulturaj iloj, feloj ktp ankaŭ „femmes folles de leur corps” [„virinojn kun fajra korpo”].

55 Prudono [Proudhon] ĉerpas unue sian idealon de justeco, de la justice éternelle [eterna justeco], el la jurrilatoj kongruaj kun la varproduktado, per kio, preterpase dirite, liveriĝas ankaŭ la pruvo tiom konsola por ĉiuj filistroj, ke la formo de varproduktado estas same eterna kiel la justeco. Poste inverse li volas laŭ tiu idealo modifi la realan varproduktadon kaj la kun ĝi kongruan realan juron. Kion oni pensus pri ĥemiisto kiu, anstataŭ studi la realajn leĝojn de metabolo kaj sur tiu bazo solvi certajn taskojn, volas modifi la metabolon per la „eternaj ideoj” de la „naturalité” [„natureco”] kaj de la „affinité” [„parenceco”]? Ĉu oni scias vere ion pli pri „uzuro”, se oni diras ke ĝi kontraŭdiras la „justice éternelle” kaj la „équité éternelle” [„eternan justecon”] kaj la „mutualité éternelle” [„eternan reciprokecon” kaj aliajn „vérités éternelles” [„eternajn verojn”], ol sciis la eklezIaj patroj kiam ili diris ke ĝi kontraŭdiras la „grâce éternelle”, la „foi éternelle”, la „volonté étenelle de dieu” [la „eternan gracon”, la „eternan kredon”, la „eternan volon de dio”]?

mon, sed la korpon. Tiun sencon por la konkreto de la varkorpo, kiu mankas al la varo, la varposedanto kompletigas per siaj kvin aŭ pli da sensoj. Lia varo havas por li nenian rektan uzvaloron. Alie li ne kondukus ĝin merkaten. Ĝi havas uzvaloron por aliuloj. Por li ĝi havas rekte nur la uzvaloron esti portanto de interŝanĝvaloro kaj tiel esti interŝanĝilo.[56] Pro tio li volas cedi ĝin, kontraŭ varo kies uzvaloro kontentigas lin. Ĉiuj varoj estas ne-uzvaloroj por iliaj posedantoj, uzvaloroj por iliaj ne-posedantoj. Ili devas do ĉiuflanke ŝanĝi la manojn. Sed tiu manŝanĝo konsistigas ilian interŝanĝon, kaj ilia interŝanĝo rilatigas ilin unu al la alia kiel valorojn kaj realigas ilin kiel valoroj. La varoj devas do realigi sin kiel valorojn, antaŭ ol ili povu realigi sin kiel uzvalorojn.

Aliflanke ili devas konfirmi sin kiel uzvaloroj, antaŭ ol ili povu realigi sin kiel valorojn. Ĉar la homa laboro elspezita al ili validas nur kondiĉe ke ĝi estas elspezita en formo por alia utila. Sed ĉu ĝi estas utila al aliuloj, ĉu ĝia produkto do kontentigas fremdajn bezonojn, tion povas pruvi nur la interŝanĝo.

Ĉiu varposedanto volas cedi sian varon nur kontraŭ alia varo kies uzvaloro kontentigas lian bezonon. Ĉe tio la interŝanĝo estas por li nur individua procezo. Aliflanke li volas realigi sian varon kiel valoron, do en ĉia al li konvena alia samvalora varo, sendepende ĉu lia propra varo havas por la posedanto de la alia varo uzvaloron aŭ ne. Ĉe tio la interŝanĝo estas por li ĝenerale socia procezo. Sed la sama procezo ne povas samtempe por ĉiuj varposedantoj esti nur individua kaj samtempe nur ĝenerale socia.

Se ni rigardas pli proksimen, tiam ĉiu varposedanto konsideras ĉiun fremdan varon kiel apartan ekvivalenton de sia varo, sian varon pro tio kiel ĝeneralan ekvivalenton de ĉiuj aliaj varoj. Sed ĉar ĉiuj varposedantoj faras la samon, neniu varo estas ĝenerala ekvivalento kaj pro tio la varoj ankaŭ ne posedas ĝeneralan relativan valorformon, en kiu ili samigas sin kiel valorojn kaj komparas sin kiel valorgrandojn. Ili do entute ne alpaŝas unu la alian kiel varoj, sed nur kiel produktoj aŭ uzvaloroj.

En sia embaraso niaj varposedantoj pensas kiel Faŭsto: „En la komenco estis la ago”[57]. Pro tio ili jam agis antaŭ ol pensi. La leĝoj de la varnaturo

56 „Ĉar duobla estas la uzado de ĉia havaĵo. – La unua apartenas al la aĵo kiel tia, la alia ne, kiel al sandalo, servi al la piedo kaj esti interŝanĝebla. Ambaŭ estas uzvaloroj de la sandalo, ĉar ankaŭ tiu kiu interŝanĝas la sandalon kun io al li mankanta, ekz-e nutraĵo, uzas la sandalon kiel sandalon. Sed ne en ĝia natura uzmaniero. Ĉar ĝi ne ekzistas por la interŝanĝo.” (Aristotelo, „De Rep.”, l. I, c. 9.)

57 Citaĵo el Goeto [Johann Wolfgang Goethe], Faŭsto: „Im Anfang war die Tat”.

funkcias en la naturinstinkto de la varposedantoj. Ili povas rilatigi siajn varojn unu al la alia nur kiel valorojn kaj pro tio nur kiel varojn, per tio ke ili rilatigas ilin kompare al ia ajn alia varo kiel ĝenerala ekvivalento. Tion rezultigis la analizo de la varo. Sed nur la socia ago povas fari certan varon ĝenerala ekvivalento. La socia ago de ĉiuj aliaj varoj do ekskludas certan varon en kiu ili ĉiuflanke prezentas siajn valorojn. Per tio la naturformo varo fariĝas socie valida ekvivalentformo. Esti ĝenerala ekvivalento fariĝas, per la socia procezo, la specife socia funkcio de la ekskludita varo. Tiel ĝi fariĝas – mono.

> „Illi unum consilium habent et virtutem et potestatem suam bestiae tradunt. Et ne quis possit emere aut vendere, nisi qui habet characterem aut nomen bestiae, aut numerum nominis ejus." [„Tiuj havas ĉiuj saman opinion kaj donos sian forton kaj potencon al la besto. (Revelacio [Apokalipso], 17:13 ) Kaj neniu povu aĉeti aŭ vendi, se li ne havas la markosignon, nome la nomon de la besto aŭ la nombron de ĝia nomo."] (Revelacio [Apokalipso], 13:17)

La monkristalo estas necesa produkto de la interŝanĝprocezo, en kiu diversspecaj laborproduktoj estas fakte samigataj kaj do fakte transformataj en varojn. La historia ampleksigo kaj profundigo de la interŝanĝo disvolvas la en la varnaturo dormantan kontraŭdiron de uzvaloro kaj valoro. La bezono ekstere prezenti tiun kontraŭdiron por la komerco estigas memstaran formon de la varvaloro kaj ne kontentiĝas ĝis kiam ĝi estas definitive atingita per la duobligo de la varo en varon kaj monon. Do laŭ la sama mezuro laŭ kiu la transformiĝo de la laborproduktoj en varojn, plenumiĝas la transformiĝo de varo en monon.[58]

La senpera produktinterŝanĝo havas unuflanke la formon de simpla valoresprimo kaj aliflanke ĝi ankoraŭ ne havas ĝin. Tiu formo estis x varo A = y varo B. La formo de la senpera produktinterŝanĝo estas: x uzobjekto A = y uzobjekto B.[59] La aĵoj A kaj B ne estas ĉi tie varoj antaŭ la interŝanĝo, sed fariĝas tiaj nur pere de ĝi. La unua maniero, en kiu uzobjekto estas eventuale interŝanĝvaloro, estas ĝia ekzistado kiel ne-uzvaloro, kiel

---

-vl

58 Laŭ tio oni povas prijuĝi la ruzecon de la etburĝa socialismo, kiu volas eternigi la varproduktadon kaj samtempe forigi la „kontraŭdiron de mono kaj varo", do la monon mem, ĉar ĝi ekzistas nur en tiu kontraŭdiro. Same bone oni povus aboli la papon kaj daŭrigi la katolikismon. Pliaj detaloj pri tio troveblas en mia verko „Zur Kritik der Politischen Oekonomie", p. 61s. [Vidu MEW, vol. 13, p. 66s.]

59 Tiom longe, kiom ankoraŭ interŝanĝiĝis ne du diversaj uzobjektoj, sed, kiel ni trovas ofte ĉe sovaĝuloj, ĥaosa amaso da aĵoj ofertiĝas kiel ekvivalento por io tria, la senpera produktinterŝanĝo mem kuŝas ankoraŭ en sia lulilo.

kvanto da uzvaloro superanta la rektajn bezonojn de sia posedanto. Aĵoj kiel tiaj estas al la homo eksteraj kaj do cedeblaj. Por ke tiu cedado fariĝu reciproka, la homoj bezonas nur alpaŝi unu la alian, per silenta agnosko, kiel privataj proprietuloj de tiuj cedotaj aĵoj kaj ĝuste per tio kiel personoj sendependaj unu de la alia. Tia rilato de reciproka fremdeco tamen ankoraŭ ne ekzistas por la membroj de natura komunumo, ĉu en formo de patriarĥa familio, prahinda komunumo, inka-ŝtato ktp. La varinterŝanĝo komenciĝas tie kie la komunumoj finiĝas, ĉe la punktoj de siaj kontaktoj kun fremdaj komunumoj aŭ kun membroj de fremdaj komunumoj. Sed ekde kiam aĵoj fariĝas varoj en la ekstera, ili retroaktive fariĝas tiaj ankaŭ en la interna komunuma vivo. Ilia kvanta interŝanĝrilato estas unue tute hazarda. Ili estas interŝanĝeblaj per la vol-ago de siaj posedantoj reciproke cedi ilin. Sed la bezono je fremdaj uzobjektoj iom post iom firmiĝas. La konstanta ripetiĝo de la interŝanĝo faras ĝin regula socia procezo. Do, iom post iom almenaŭ parto de la laborproduktoj devas esti produktataj intence por interŝanĝo. Ekde tiu momento firmiĝas unuflanke la distingo inter la utileco de aĵoj por la rekta bezono kaj ilia utileco por interŝanĝo. Ilia uzvaloro disiĝas de ilia interŝanĝvaloro. Aliflanke la kvanta proporcio, per kiu ili interŝanĝas, fariĝas dependa de ilia produktado mem. La kutimo fiksas ilin kiel valorgrandojn.

En la senpera produktinterŝanĝo ĉiu varo estas rekta interŝanĝilo por sia posedanto, ekvivalento por sia ne-posedanto, sed nur se ĝi estas uzvaloro por li. La interŝanĝartiklo do ankoraŭ ne ricevas valorformon sendependan de sia propra uzvaloro aŭ de la individua bezono de la interŝanĝantoj. La neceso de tiu formo disvolviĝas kun la kreskanta nombro kaj diverseco de la varoj kiuj eniras la interŝanĝprocezon. La tasko estiĝas samtempe kun la rimedoj por ĝia plenumado. Cirkulado, en kiu varposedantoj interŝanĝas kaj komparas siajn proprajn artiklojn kun diversaj aliaj artikloj okazas neniam sen ke diversaj varoj de diversaj varposedantoj estas interŝanĝataj kaj kiel valoroj komparataj ene de sia cirkulado kun unu sama tria varspeco. Tia tria varo, per tio ke ĝi fariĝas ekvivalento por diversaj aliaj varoj, ricevas rekte, eĉ se en malvastaj limoj, ĝeneralan aŭ socian ekvivalentformon. Tiu ĝenerala ekvivalentformo estiĝas kaj malestiĝas kun la momenta socia kontakto kiu naskis ĝin. Alterne kaj efemere ĝi atribuiĝas al jen tiu jen alia varo. Sed kun la evoluo de la varinterŝanĝo ĝi gluiĝas ekskluzive al apartaj varspecoj aŭ kristaliĝas al monformo. Al kiu varspeco ĝi restas gluita, tio estas unue hazarda. Sed ĝenerale decidas du cirkonstancoj. Monformo fiksiĝas aŭ al la plej gravaj importataj artikloj[60], kiuj estas fakte naturaj aperformoj de la

60 *Laŭvorte:* „enŝanĝartiklo el la fremdo”. -vl

interŝanĝvaloro de la propraj produktoj, aŭ al tiu uzobjekto kiu konsistigas la ĉefan elementon de la propra cedebla posedaĵo, kiel ekz-e brutaro. Nomadpopoloj disvolvas unue la monformon, ĉar ĉiu ilia havaĵo troviĝas en movebla, do rekte cedebla formo, kaj ĉar ilia vivmaniero kontaktigas ilin konstante kun fremdaj komunumoj kaj pro tio instigas ilin al produkt-interŝanĝo. La homoj faris ofte la homon mem en la formo de sklavo la praa monmaterialo, sed neniam grundon. Tia ideo povis aperi nur en jam disvolvita burĝa socio. Ĝi datiĝas de la lasta triono de la 17-a jarcento, kaj ĝia realigo, sur nacia nivelo, estis provita nur jarcenton poste en la burĝa revolucio de la francoj.

En la sama proporcio, laŭ kiu la varinterŝanĝo rompas siajn nur lokajn limojn, la varvaloro do etendiĝas al materialo de homa laboro entute, la monformo transiras al varoj kiuj nature taŭgas por socia funkcio de ĝenerala ekvivalento, al la noblaj metaloj.

Ke „kvankam oro kaj arĝento ne estas de naturo mono, mono estas de naturo oro kaj arĝento”[61], montras la kongruecon de iliaj naturaj ecoj kun siaj funkcioj.[62] Sed ĝis nun ni konas nur tiun funkcion de la mono, servi kiel aperformo de la varvaloro aŭ kiel la materialo en kiu la valorgrandoj de la varoj esprimiĝas socie. Adekvata aperformo de valoro aŭ materiiĝo de abstrakta kaj pro tio sama homa laboro povas esti nur materio kies ĉiuj ekzempleroj posedas la saman samforman kvaliton. Aliflanke, ĉar la diferenco de la valorgrandoj estas pure kvanta, la monvaro devas esti kapabla je pure kvantaj diferencoj, do arbitre dividebla kaj el siaj partoj rekunmetebla. Nu, oro kaj arĝento posedas tiujn ecojn nature.

La uzvaloro de la monvaro duobliĝas. Apud sia aparta uzvaloro kiel varo, kiel oro ĝi servas ekz-e por plenigo de kavaj dentoj, krudmaterialo por luksaj artikloj ktp, ĝi ricevas formalan uzvaloron, kiu fontas el siaj specifaj sociaj funkcioj.

Ĉar ĉiuj aliaj varoj estas nur apartaj ekvivalentoj de la mono, la mono ilia ĝenerala ekvivalento, ili rilatas kiel apartaj varoj al la mono kiel la ĝenerala varo.[63]

Ni vidis, ke la monformo estas nur la reflektiĝo, restanta ĉe iu varo, de

61 Karlo Markso, l,c. p. 135. [Vidu volumon 13, p. 131] „La metaloj … estas de naturo mono.” (Galiani: „Della Moneta” en Kolektaĵo de Custodi, Parte Moderna, v. III, p. 137.)

62 Pliaj detaloj pri tio en mia ĵus citita skribaĵo, ĉapitro: „La noblaj metaloj”.

63 „La mono estas la ĝenerala varo.” (Verri, l.c. p. 16.)

la valorrilatoj al ĉiuj aliaj varoj. Ke mono estas varo[64], tio estas do nova malkovro nur por tiu kiu, por analizi ĝin, komencas ĉe ĝia finita formo. La interŝanĝprocezo donas al la varo, kiun ĝi transformas al mono, ne ĝian valoron, sed ĝian specifan valorformon. La konfuzo de la du difinoj miskondukis al tio konsideri la valoron de oro kaj de arĝento imaga.[65] Ĉar mono anstataŭigeblas, en certaj funkcioj, per nuraj signoj de si mem, estiĝis la alia eraro ke ĝi estas nura signo. Aliflanke en tiu eraro kuŝis la antaŭsento ke la monformo de la aĵo estas al ĝi mem ekstera kaj nura aperformo de malantaŭ ĝi kaŝitaj homaj rilatoj. En tiu senco ĉia varo estus signo, ĉar kiel valoro nur aĵa ŝelo de la homa laboro elspezita en ĝin.[66]

64 „Arĝento kaj oro kiel tiaj, kiujn ni per la komuna nomo povas nomi noblaj metaloj, estas … varoj … kies valoro … kreskas aŭ malkreskas. Al la nobla metalo oni povas atribui pli altan valoron, kiam malpli granda pezo da ĝi aĉetas pli grandan kvanton de la produkto aŭ fabrikaĵo de lando ktp.” ([S. Clement:] „A Discourse of the General Notions of Money, Trade, and Exchange, as they stand in relations to each other. By a Merchant”, Londono 1695, p. 7.) „Arĝento kaj oro, ĉu stampita aŭ ne, estas ja uzataj kiel mezurilo por ĉiuj aliaj aĵoj, sed ili ne estas malpli varo ol vino, oleo, tabako, tolo aŭ ŝtofoj.” ([J. Child:] „A Discourse concerning Trade, and that in particular of the East-Indies etc.”, Londono 1689, p. 2) *„Havaĵo kaj riĉaĵo de reĝlando povas precize dirite ne esti limigitaj al mono, nek povas esti ekskluditaj oro kaj arĝento kiel varoj.”* ([Th. Papillon:] „The East India Trade a most Profitable Trade”, Londono 1677, p. 4.)

65 „Oro kaj arĝento havas valoron kiel metalo, antaŭ ol esti mono.” (Galiani, l.c. [p. 72]) Locke diras: *„La ĝenerala interkonsento de la homo atribuis al la arĝento imagan valoron, pro ties kvalitoj kiuj taŭgigas ĝin kiel monon.”* [John Locke, „Some Considerations etc.”, 1691, en „Works”, eld. 1777, v. II, p. 15.] Aliflanke Law: „Kiel eblus ke diversaj nacioj donus al ia aĵo imagan valoron … aŭ kiel tiu imaga valoro povintus konserviĝi?” Sed kiom malmulte li mem komprenis pri la afero: „La arĝento interŝanĝiĝis laŭ sia uzvaloro, kiun ĝi havis, do laŭ sia reala valoro; per sia destino kiel mono ĝi ricevis aldonan valoron (une valeur additionnelle).” (Jean Law, „Considérations sur le numéraire et le commerce” en E. Daires Édit. de la „Économistes Financiers du XVIII^e siècle”, p. 469, 470.)

66 „La mondo estas ilia [de la varoj] signo.” (V. de Forbonnais: „Éléments du Commerce”, Nouv. Édit. Leyde 1766, t. II, p. 143.) „Kiel signo ĝi esta altirata de la varoj.” (l.c. p. 155.) „La mono estas signo por afero kaj reprezentas ĝin.” (Montesquieu, „Esprit des Lois”, Oeuvres, Londono 1767, t. II, p. 3) „La mono ne estas nura signo, ĉar ĝi estas mem riĉaĵo; ĝi ne reprezentas la valorojn, ĝi estas ĝia ekvivalento.” (Le Trosne, l.c. p. 910.) „Se oni konsideras la nocion de valoro, tiam la afero mem estas rigardata nur kiel signo, kaj ĝi ne estas konsiderata kiel ĝi mem, sed kiom ĝi valoras.” (Hegelo, l.c. p. 100.) Longan tempon antaŭ la ekonomikistoj, la juristoj furorigis la ideon pri mono

Sed per tio ke oni deklaras nuraj signoj la sociajn karakterojn kiujn aĵoj ricevas, aŭ la aĵajn karakterojn kiujn ricevas sociaj determinoj de la laboro surbaze de certa produktadmaniero, oni deklaras ilin samtempe arbitra reflektadprodukto de la homoj[67]. Tio estis ŝatata klerigmaniero de la 18-a jarcento por forpreni almenaŭ la ŝajnon de fremdeco de la enigmaj formoj de homaj rilatoj, kies estiĝprocezon oni ankoraŭ ne kapablis deĉifri.

Antaŭe ni jam menciis ke la ekvivalentformo de varo ne inkludas la kvantan difinon de ĝia valorgrando. Se oni scias, ke oro estas mono, do interŝanĝebla kun ĉiuj aliaj varoj, tiam oni pro tio ne scias kiom valoras ekz-e 10 funtoj da oro. Kiel ĉiu varo, la mono povas esprimi sian valorgrandon nur relative en aliaj varoj. Ĝia propra valoro estas determinata de la labortempo necesa por ĝia produktado kaj esprimiĝas en la kvanto de ĉia alia varo, en kiu koaguliĝis same multa labortempo.[68] Tiu determinado de ĝia relativa valorgrando okazas ĉe ĝia produktejo en sia unua rekta interŝanĝkomerco. Ekde kiam ĝi eniras la cirkuladon kiel mono, ĝia valoro estas jam donita. En la lastaj jardekoj de la 17-a jarcento, la analizo de la mono jam montris ke ĝi estas varo; sed tiu analizo estis nur je sia komenco. La malfacilo konsistas ne en la kompreno ke mono estas varo,

kiel nura signo kaj pri la nur imaga valoro de la noblaj metaloj, en la servo de la reĝa potenco [en la orig.: im Sykophantendienst der königlichen Gewalt -vl], kies rajton je monfalsado ili tra la tuta mezepoko bazis sur la tradicioj de la romia imperio kaj la monnocioj de la pandektoj. „Neniu povas kaj rajtas dubi", diras ilia lernema disĉiplo, Philipp de Valois, en dekreto de 1346, „ke rajtas nur Ni kaj Nia reĝa moŝto … je monstampado, produktado, ecoj, provizado kaj ĉiaj monrilataj dekretoj, cirkuligi ilin tiel kaj je tia prezo kiel plaĉas kaj bonŝajnas al Ni." Estis romia jurdogmo ke la imperiestro dekretis la monvaloron. Estis eksplicite malpermesate trakti monon kiel varon. „Sed aĉeti monon estu permesata al neniu, ĉar kreita por ĝenerala uzo, ĝi ne estu varo." Bona argumentado pri tio de G. F. Pagnini: „Saggio sopra il giusto pregio delle cose", 1751, ĉe Custodi, Parte Moderna, t. II. Nome en la dua parto de la verko Pagnini polemikas kontraŭ la sinjoroj juristoj.

67 *En la angla eldono:* „… arbitraj fikcioj agnoskitaj de la tiel nomata universala interkonsento de la homaro. -vl

68 „Se iu povas porti uncon da arĝento el la interno de la tero de Peruo al Londono en la sama tempo kiun li bezonus por produkti buŝelon da greno, tiam la unua aĵo estas la natura prezo de la alia; se li nun per ekspluatado de novaj kaj pli fruktodonaj minejoj anstataŭ la unu uncon da arĝento povas gajni per la sama energielspezo du uncojn, tiam la greno ĉe prezo de po 10 ŝilingoj por ĉiu buŝelo estos same malmulte kosta kiel antaŭe kun prezo de 5 ŝilingoj, caeteris paribus [kun cetere samaj cirkonstancoj]" (William Petty, „A Treatise of Taxes and Contributions", Londono 1667, p. 31.)

sed kiel, kial kaj per kio mono estas varo.[69]

Ni vidis, ke jam en la plej simpla valoresprimo, x varo A = y varo B, la aĵo, en kiu prezentiĝas la valorgrando de alia aĵo, ŝajnas posedi sian ekvivalentformon, sendepende de tiu rilato, kiel socian naturkvaliton. Ni sekvis tiun malĝustan ŝajnon ĝis ĝia solidiĝo. Tiu ŝajno estas komplete establita ekde kiam la ĝenerala ekvivalentformo kunkreskis kun la naturformo de aparta varspeco kaj tiel kristaliĝis al monformo. Laŭ la ŝajno, varo fariĝas mono ne ĉar la aliaj varoj prezentas ĉiuflanke siajn valorojn en ĝi, sed, inverse, ĉiuj aliaj varoj prezentas siajn valorojn en ĝi ĉar ĝi estas mono. La peranta moviĝo malaperas en sia propra rezulto sen postlasi spuron. La varoj, sen sia propra iniciato, trovas sian propran valorformon preta en formo de varkorpo ekzistanta ekster kaj apud ili. Tiuj aĵoj, oro kaj arĝento, kiaj ili venas el la intestoj de la tero, estas samtempe la rekta enkarniĝo de ĉia homa laboro. Pro tio la magio de la mono. La nur atomeca konduto de la homoj en sia socia produktad-procezo kaj pro tio la konkreta formo de iliaj propraj produktadrilatoj, sendependa de ilia kontrolo kaj de ilia konscia individua agado, aperas unue en tio ke iliaj laborproduktoj ĝenerale alprenas la varformon. La enigmo de la monfetiĉo estas do nur la enigmo de la varfetiĉo, kiu frapas la okulojn en sia plej brila formo.

69 Post kiam s-ro Profesoro Roscher instruis nin: „La malĝustaj difinoj de mono divideblas en du ĉefajn grupojn: tiuj, kiuj konsideras ĝin pli, kaj tiuj kiuj konsideras ĝin malpli ol varo”, aperas ĥaosa aro da skribaĵoj pri la mono, kiun trabriletas eĉ ne la plej eta kompreno de la reala historio de la teorio, kaj poste la moralo: „Cetere ne kontesteblas ke la plej multaj novaj ekonomikistoj ne sufiĉe konsideris la apartajn ecojn kiuj distingas la monon disde aliaj varoj” (do, ĉu tamen pli aŭ malpli ol varo?) „… Tiurilate la duonmerkantilisma reago de Ganilh ktp ne estas tute malprava.” (Wilhelm Roscher, „Die Grundlagen der Nationalökonomie”, 3-a eld., 1858, p. 207-210). Pli – malpli – ne sufiĉe – tiurilate – ne tute! Kiaj difinoj! Kaj tian eklektan profesoran sensencan babiladon s-ro Roscher modeste nomas „la anatomia-fiziologia metodo” de la politika ekonomio! Tamen unu malkovron ni ŝuldas al li, tiun ke mono estas „agrabla varo”.

# TRIA ĈAPITRO – *Mono kaj varcirkulado*

## 1.1. Mezuro de la valoroj

Mi konsideras ĉie en tiu ĉi verko, pro simpligo, oron kiel monvaron.

La unua funkcio de la oro konsistas en tio, liveri al la varmondo la materialon de ĝia valoresprimo aŭ prezenti la varvalorojn kiel samnomajn grandojn, kvalite samajn kaj kvante kompareblajn. Tiel ĝi funkcias kiel ĝenerala mezuro de la valoroj, kaj nur per tiu funkcio la oro, la specifa ekvivalentvaro, fariĝas unue mono.

La varoj fariĝas kunmezureblaj ne per la mono. Inverse. Ĉar ĉiuj varoj estas konkretigita homa laboro, pro tio per si mem kunmezureblaj, ili povas mezuri siajn valorojn komune en la sama specifa varo kaj tiun per tio transformi en sia komuna valormezuro aŭ mono. Mono kiel valormezurilo estas necesa aperformo de la imanenta valormezuro de la varoj, la laboro.[70]

La valoresprimo de varo en oro – x varo A = y monvaro – estas ĝia monformo aŭ ĝia prezo. Okaza ekvacio, kiel 1 tuno da fero = 2 uncoj da oro, sufiĉas nun por prezenti la fervaloron en socie valida maniero. La ekvacio ne bezonas plu paradi en la vico de valorekvacioj de la aliaj varoj, ĉar la ekvivalentvaro, la oro, posedas jam la karakteron de mono. La ĝenerala relativa valorformo de la varoj havas pro tio jam ree la formon de sia origina, simpla aŭ okaza[71] relativa valorformo. Aliflanke la disvolvita relativa valoresprimo aŭ la senfina vico de relativaj valor-

70 La demando, kial la mono ne reprezentas rekte la labortempon mem, tiel ke ekz-e papernoto prezentas x laborhorojn, redukteblas tutsimple al la demando, kial surbaze de la varproduktado la laborproduktoj devas prezentiĝi kiel varoj, ĉar la prezentado de la varo inkludas ĝian duobliĝon en varo kaj monvaro. Aŭ kial privatlaboro ne trakteblas rekte kiel socia laboro, kiel ĝia malo. Mi aliloke detale pritraktis la banalan utopiecon de „labormono” surbaze de varproduktado. (l.c. p. 61s. [Vidu MEW, vol. 13, p. 66sj.]) Ĉi tie estu ankoraŭ menciite ke ekz-e la „labormono” de Oveno tute ne estas mono, same kiel ekz-e teatrobileto. Oveno antaŭkondiĉas rekte sociigitan laboron, produktadformon rekte kontraŭan al la varproduktado. La laboratesto konstatas nur la individuan parton de la produktanto ĉe la komunlaboro kaj lian individuan rajton je la parto de la komunprodukto destinita al konsumado. Sed Oveno ne kapricas antaŭkondiĉi la varproduktadon kaj tamen voli ĉirkaŭiri ties neprajn kondiĉojn per monfuŝadoj.

71 *En la originalo:* … einzelnen (unuopa), en la angla versio: isolated (izolita). -vl

esprimoj fariĝas la specife relativa valorformo de la monvaro. Sed tiu vico estas nun jam socie donita en la varprezoj. Oni bezonas nur legi la kvotadojn de preztabelo inverse, kaj oni trovas la valorgrandon de la mono prezentita en ĉiaj eblaj varoj. Sed mono mem ne havas prezon. Por partopreni en tiu unueca relativa valorformo de la aliaj varoj, ĝi devus esti rilatigita al si mem kiel al sia propra ekvivalento.

La prezo aŭ la monformo de la varoj estas, kiel ilia valorformo entute, formo diversa de ĝia palpeble reala korpoformo, do nur ideeca aŭ imagita formo. La valoro de fero, tolo, tritiko ktp ekzistas, kvankam nevideble, en tiuj aĵoj mem; ĝi estas idee perceptebla per ilia sameco kun oro, rilato al oro, kiu por tiel diri vagas nur en iliaj kapoj. La vargardisto devas do ŝovi sian langon en ilian kapon aŭ pendigi al ili paperslipojn, por komuniki iliajn prezojn al la ekstera mondo.[72] Ĉar la esprimo de la varvaloroj en oro estas idea, por tiu operacio aplikeblas ankaŭ nur imagita aŭ idea oro. Ĉiu vargardisto scias, ke li ankoraŭ tute ne origas siajn varojn kiam li donas al ilia valoro la formon de prezo aŭ imagitan orformon, kaj ke li bezonas eĉ ne peceton da reala oro por pritaksi milionojn da varvaloroj en oro. En sia funkcio de valormezurilo la oro servas do – kiel nur imagata aŭ idea mono. Tiu cirkonstanco kaŭzis la plej frenezajn teoriojn.[73] Kvankam nur imagata mono servas por funkcio de valormezuro, la prezo dependas tute de la reala monmaterialo. La valoro, t.e. la kvanto da homa laboro, kiu estas entenata ekz-e en tuno da fero, estas esprimata en imagata kvanto da monvaro, kiu entenas same multan laboron. Do, laŭ tio ĉu oro, arĝento aŭ kupro servas kiel valormezuro, la valoro de la tuno da fero estas prezentata en tute diversaj kvantoj da oro, da arĝento aŭ da kupro.

72 Sovaĝulo aŭ duonsovaĝuloj uzas la langon alie. Kapitano Parry rimarkigas ekz-e pri la loĝantoj ĉe la okcidenta bordo de la Baffin-golfo: „En tiu okazo (ĉe produktinterŝanĝo) … ili prilekas ĝin (la aĵon al ili ofertatan) dufoje per la lango, post kiam ili ŝajnis konsideri la negocon kiel kontentige finitan.” Same ĉe la orientaj eskimoj la interŝanĝanto prilekis ĉiufoje la artiklon ĉe ties akcepto. Se la lango estas konsiderata en la nordo kiel organo de akcepto, tiam ne mirigas, ke la ventro en la sudo konsideratas kiel organo de la akumulita proprieto kaj ke la kafro pritaksas la riĉaĵon de viro laŭ ties dika ventro. La kafroj bone komprenas la aferon, ĉar dum la oficiala brita sanraporto de 1864 plendas pri manko de granda parto de la laborista klaso je grasigaj nutraĵoj, iu D-ro Harvey (tamen ne tiu kiu malkovris la sangcirkuladon) samjare riĉiĝis per receptoj [originale: durch Puff-Rezepte … -vl], kiuj promesis al la burĝaro kaj aristokrataro redukti la tro abundan grason.

73 Vidu Karl Marx: „Zur Kritik ktp.”, „Theorien von der Maßeinheit des Geldes”, p. 53s. [Vidu MEW, vol. 13, p. 59s.]

Do, se du diversaj varoj, ekz-e oro kaj arĝento, servas samtempe kiel valormezuroj, tiam ĉiuj varoj posedas du diversajn prezesprimojn, orprezojn kaj arĝentoprezojn, kiuj kuras trankvile unu apud la alia, tiom longe kiom la valorrilato de arĝento al oro restas senŝanĝa, ekz-e = 1:15. Sed ĉiu ŝanĝo de tiu valorrilato ĝenas la rilaton inter la orprezoj kaj la arĝentoprezoj de la varoj kaj tiel pruvas fakte, ke la duobleco de la valormezuro kontraŭdiras ties funkcion.[74]

La preze deteriminitaj varo prezentiĝas ĉiuj en la formo: *a* varo A = *x* oro, *b* varo B = *z* oro, *c* varo C = *y* oro ktp, kie *a*, *b*, *c* prezentas certajn kvantojn de la varspecoj A, B, C, kaj *x*, *z*, *y* certajn kvantojn da oro. La varvaloroj estas do transformitaj en imagataj orkvantoj de diversaj grandoj, do, malgraŭ la konfuza diverseco de la varkorpoj, en samnomajn grandojn, orgrandojn. Kiaj tiaj diversaj orkvantoj ili komparas kaj mezuras sin reciproke, kaj teĥnike evoluas la neceso rilatigi ilin al fiksa kvanto da oro kiel mezurunuo. Tiu mezurunuo mem estas plu disvolvata per plua

74 *Noto al la 2-a eld.:* „Kie oro kaj arĝento ekzistas laŭleĝe kiel mono, t.e. kiel valormezuro unu apud la alia, oni ĉiam vane provis trakti ilin kiel unu saman materialon. Se oni supozas, ke la sama labortempo devas konkretiĝi senŝanĝe en la sama proporcio de arĝento kaj oro, tiam oni fakte supozas, ke arĝento kaj oro estas la sama materialo kaj ke certa kvanto de la malpli valora metalo, de arĝento, konsistigas la neŝanĝeblan onon de certa orkvanto. De la regado de Eduardo la 3-a ĝis la epoko de Georgo la 2-a la historio de la angla monsistemo evoluas en seninterrompa vico da ĝenoj, devenaj el la kolizio inter la leĝa fiksado de la valorrilato de oro kaj arĝento kaj iliaj realaj ŝanceliĝoj. Jen oro estis taksita tro alte, jen arĝento. La metalo taksita tro malalte estis retirata el la cirkulado, fandata kaj eksportata. La valorrilato de la du metaloj estis poste leĝe reŝanĝita, sed la nova nominalvaloro kun la reala valorrilato baldaŭ same konfliktis kiel la malnova. – En nia propra tempo, la tre malforta kaj nedaŭra falo de la valoro de oro kontraŭ arĝento, sekve al la hinda-ĉina arĝentpostulo, produktis la saman fenomenon en plej alta grado en Francio, eksportadon de arĝento kaj ĝia forigo el la cirkulado favore al oro. Dum la jaroj 1855, 1856, 1857 la pluso de la orimportado en Francion super la oreksportado el Francio estis 41.580.000 sterlingaj pundoj, dum la pluso de la arĝenteksportado super la arĝentimportado estis 34.704.000 sterlingaj pundoj. [2-a ĝis 4-a eldono: 14.704.000 sterlingaj pundoj]. Efektive, en landoj kie ambaŭ metaloj estas leĝaj valormezuroj, pro tio ambaŭ akceptendas kiel pago, sed ĉiu laŭplaĉe rajtas pagi per arĝento aŭ per oro, la valorkreskanta metalo portas aĝion kaj mezuras sian prezon kiel ĉiu alia varo en la trotaksata metalo, dum tiu servas sole kiel valormezuro. Ĉia historia sperto tiukampe reduktiĝas simple al tio ke, kie du varoj plenumas leĝe la funkcion de valormezuro, fakte nur unu okupas la lokon kiel tia." (Karl Marx, l.c., p. 52, 53. [vidu MEW, vol. 13, p. 58/59]

samgrada divido[75] al skalo. Antaŭ sia moniĝo, oro, arĝento, kupro jam posedas tiajn skalojn en siaj metalpezoj, tiel ke ekz-e pundo servas kiel mezurilo kaj estas ĉe la unua flanko disdividita en uncoj ktp, ĉe la alia flanko adiciataj al pundocento ktp.[76] Ĉe ĉia metalcirkulado la ekzistantaj nomoj de la pezoskalo estas ankaŭ la originaj nomoj de la monskalo aŭ prezskalo.

Kiel *mezuro de la valoroj* kaj kiel *skalo de la prezoj*[77] la mono plenumas du tute diversajn funkciojn. Ĝi estas mezuro de la valoroj estante la socia enkarniĝo de la homa laboro[78], skalo de la prezoj kiel fiksita metalpezo. Kiel valormezuro ĝi servas transformi la valorojn de la konfuze diversaj varoj en prezojn, en imagatajn orkvantojn. Je la mezuro de la valoroj la varoj mezuriĝas kiel valoroj, sed la skalo de la prezoj mezuras la orkvantojn je unu orkvanto, ne la valoron de orkvanto je la pezo de alia. Pro la prezskalo fiksendas certa orpezo kiel mezurunuo. Ĉi tie, kiel ĉe ĉiuj aliaj mezurdifinoj de samnomaj grandoj, la firmeco de la mezurrilatoj fariĝas decida. La skalo de la prezo plenumas pro tio sian funkcion des pli bone, ju pli senŝanĝa unu sama orkvanto servas kiel mezurunuo. Kiel valormezuro oro povas nur servi ĉar ĝi estas mem laborprodukto, do eventuale ŝanĝebla valoro.[79]

Unue klaras, ke valorŝanĝo de oro neniel malutilas ĝian funkcion kiel skalo de prezoj. Kiom ajn ŝanĝiĝas la orvaloro, diversaj orkvantoj restas ĉiam en la sama valorrilato inter si. Se la orvaloro falus je 1.000 %, tiam daŭre 12 uncoj da oro posedus 12-oble pli da valoro ol unco da oro, kaj ĉe la prezoj temas nur pri la rilato de diversaj orkvantoj inter si. Ĉar aliflanke unco da oro kun la falo aŭ kresko de sia valoro tute ne ŝanĝas sian pezon, same tiu de ĝiaj samgradaj partoj ne ŝanĝiĝas, kaj tiel la oro kiel fiksa

75 Divido en alikvotajn partojn. -vl

76 *Noto al la 2-a eld.:* La strangeco, ke la unco da oro kiel unuo de la monskalo en Anglio ne estas dividita en samgrandaj partoj, klariĝas sekve: „Nia monsistemo estis origine adaptita nur al la uzado de arĝento – pro tio, unco da arĝento estas ĉiam dividebla en certa samgranda nombro da moneroj; sed ĉar oro estis nur en posta tempo enkondukita en monsistemo kiu estis adaptita nur al arĝento, unco da oro ne povas esti stampita en samgranda nombro da moneroj.” (Maclaren: „History of the Currency”, Londono 1858, p. 16.)

77 La du kursivigoj nur en la angla eld. -vl

78 *En la franca eld.*, anstataŭ „la socia enkarniĝo de la homa laboro”: „ĝenerala ekvivalento”. -vl

79 *Noto al la 2-a eld.:* En anglaj skriboj la konfuziĝo pri mezuro de valoroj (measure of value) kaj skalo de prezoj (standard of value) estas nedirebla. La funkcioj kaj do iliaj nomoj estas konstante konfuzataj.

skalo de la prezo faras ĉiam la saman servon, kiom ajn ŝanĝiĝas ĝia valoro.

La valorŝanĝo de oro ankaŭ ne malhelpas ĝian funkcion kiel valormezuron. Ĝi trafas ĉiujn varojn samtempe, lasas do, se ĉio alia restas sama, iliajn relativajn valorojn senŝanĝaj, kvankam ili ĉiuj esprimiĝas nun en pli altaj aŭ pli malaltaj orprezoj ol antaŭe.

Kiel ĉe la prezentado de la valoro de varo en la uzvaloro de iu ajn alia varo, tiel ankaŭ ĉe la taksado de la varoj en oro estas antaŭkondiĉita nur ke je donita tempo la produktado de certa orkvanto kostas donitan kvanton da laboro. Koncerne la moviĝon de la varprezoj entute, validas la pli frue disvolvitaj leĝoj de la simpla relativa valoresprimo.

La varprezoj povas ĝenerale nur kreski, ĉe samrestanta monvaloro, kiam kreskas la varvaloroj; ĉe samrestantaj varvaloroj, kiam la monvaloro falas. Pro tio tute ne sekvas, ke kreskanta monvaloro kondiĉas proporcian falon de la varprezoj kaj falanta monvaloro proporcian kreskon de la varprezoj. Tio validas nur por varo de neŝanĝita valoro. Tiaj varoj ekz-e, kies valoro samgrade kaj samtempe kreskas kun la monvaloro, konservas la samajn prezojn. Se ilia valoro kreskas pli malrapide aŭ pli rapide ol la monvaloro, tiam la falo aŭ kresko de iliaj prezoj estas determinata de la diferenco inter ilia valormoviĝo kaj tiu de la mono, ktp.

Ni nun revenu al la analizado de la prezformo.

La monnomoj de la metalpezoj iom post iom disiĝas de iliaj originaj peznomoj pro pluraj kaŭzoj, inter ili historie decidaj:

**1.** Enkonduko de fremda mono ĉe malpli evoluintaj popoloj, kiel ekz-e en la antikva Romo arĝentaj kaj oraj moneroj cirkulis unue kiel eksterlandaj varoj. La nomoj de tiu fremda mono estas aliaj ol la enlandaj peznomoj.

**2.** Kun la evoluo de la riĉeco la malpli nobla metalo estas elŝovata el la funkcio de valormezuro per la pli nobla. Kupro per arĝento, arĝento per oro, kvankam tiu vico povas kontraŭdiri ĉian poetan kronologion.[80] Pundo estis ekz-e monnomo por vera funto[81] da arĝento. Ekde kiam oro elŝovas la arĝenton kiel valormezuron, tiu sama nomo gluiĝas eble al $^{1}/_{15}$ de funto da oro, laŭ la valorrilato de oro kaj arĝento. Pundo kiel monnomo kaj kiel

80 Tiu cetere ne havas ĝenerale historian validecon.

81 La Esperantaj vortoj *funto* (pezo) kaj *pundo* (brita monunuo) havas saman etimologion en *pundo* kun la senco de *funto* (la mezurunuo de pezo). -vl

kutima peznomo de oro estas nun disigitaj.[82]

**3.** La dum jarcentoj daŭrigata monfalsado de la princoj, kiu restigis de la origina pezo de la moneroj efektive nur la nomon.[83]

Tiuj historiaj procezoj faras la disigon de monnomo de la metalpezoj disde ilia kutima peznomo popolkutimo. Ĉar la monskalo unuflanke estas pure konvencia, aliflanke bezonas ĝeneralan validecon, ĝi estas fine reguligata per la leĝo. Certa pezparto de la nobla metalo, ekz-e unco da oro, estas oficiale dividita en samgrandajn partojn kiuj ricevas leĝajn nomojn, kiel pundo, talero ktp. Tia samgranda parto, kiu tiam validas kiel la vera mezurunuo de la mono, estas subdividita en aliaj samgrandaj partoj per leĝaj nomoj kiel ŝilingo, penny ktp.[84] Daŭre certaj metalpezoj restas skalo de metalmono. Kio ŝanĝiĝis, estas subdivido kaj nomado.

La prezoj, aŭ la orkvantoj, en kiujn la valoroj de la varoj estas idee transformitaj, estas nun do esprimataj en la monnomoj aŭ leĝe validaj kalkulnomoj de la orskalo. Anstataŭ do diri, ke kvarto da tritiko egalas unu uncon da oro, oni dirus en Anglio, ke ĝi egalas al 3 sterlingaj pundoj 17 ŝilingoj 10$^1/_2$ d. La varoj tiel diras al si per siaj monnomoj kiom ili valoras, kaj la mono servas kiel kalkulmono, tiom ofte kiom necesas fiksi aĵon kiel valoron kaj do en monformo.[85]

La nomo de aĵo estas tute ekstera al ĝia naturo. Mi scias nenion pri homo, se mi scias ke homo nomiĝas Jakobo. Same en la monnomoj pundo, talero, franko, dukato ktp malaperas ĉia spuro de la valorrilato. La konfuzo pri la sekreta senco de tiuj kabalismaj signoj estas des pli granda, ĉar la monnomoj esprimas la valoron de la varoj kaj samtempe same

82 *Noto al la 2-a eld.:* Tiel la angla pundo signas malpli ol trionon de sia origina pezo, la skota pundo antaŭ la unuiĝo jam nur $^1/_{36}$, la franca Livre $^1/_{1000}$, la portugala Rei eĉ multe pli malgrandan proporcion.

83 *Noto al la 2-a eld.:* „La moneroj, kies nomoj estas hodiaŭ jam nur ideaj, estas ĉe ĉiuj nacioj la plej malnovaj; ili ĉiuj estis iam realaj, kaj ĝuste ĉar ili estis realaj, oni kalkulis per ili.” (Galiani: „Della Moneta”, l.c., p. 153.)

84 *Noto al la 2-a eld.:* S-ro David Urquhart rimarkigas en siaj „Familiar Words” pri la monstraĵo (!) ke nuntempe pundo (£ St.), la unuo de la angla monskalo, estas proksimume sama kiel $^1/_4$ unco da oro: „Tio estas falsado de mezuro kaj ne fiksado de skalo.” [p. 105] Li trovas en tiu „falsa nomado” de la orpezo kiel ĉie aliloke la falsantan manon de la civilizacio.

85 *Noto al la 2-a eld.:* „Kiam oni demandis al Anacharsis, por kio la helenoj bezonas la monon, li respondis: por kalkuli.” (Athen[aeus], „Deipn.”, 1. IV, 49, v. 2 [p. 120], eld. Schweighäuser, 1802.)

grandajn partojn de metalpezo, de la monskalo.[86] Aliflanke necesas ke la valoro, kontraste al la plej diversaj korpoj de la varmondo, plu evoluu al tiu sennocie konkreta, sed ankaŭ pure socia formo.[87]

La prezo estas la monnomo de la laboro konkretigita en la varo. La ekvivalento de la varo kaj de la monkvanto, kies nomo estas ĝia prezo, estas do taŭtologio[88], kiel ja entute la relativa valoresprimo de varo estas ĉiam la esprimo de la ekvivalento de du varoj. Sed se la prezo kiel eksponento de la valorgrando de la varo estas eskponento de sia interŝanĝrilato kun mono, tiam ne sekvas inverse, ke la eksponento de ĝia interŝanĝrilato kun mono estas nepre la eksponento de ĝia valorgrando. Ni supozu ke socie necesa laboro de sama grando prezentiĝas ekz-e en 1 kvarto da tritiko kaj en 2 sterlingaj pundoj (proksimume $^1/_2$ unco da oro). Tiuj 2 sterlingaj pundoj estas monesprimo de la valorgrando de la kvarto da tritiko, aŭ ĝia prezo. Se la cirkonstancoj permesas noti ĝin je 3 sterlingaj pundoj, aŭ se ili devigas noti ĝin je 1 sterlinga pundo, tiam 1 sterlinga pundo kaj 3 sterlingaj pundoj estas esprimoj de la valorgrando de la tritiko tro malgranda aŭ tro granda, sed ili estas tamen ĝiaj prezoj, ĉar unue ili estas ĝia valorformo, mono, kaj due eksponentoj de ĝia interŝanĝrilato kun mono. Ĉe same restantaj produktadkondiĉoj aŭ same restanta pro-

86 *Noto al la 2-a eld.:* „Ĉar la oro [2-a ĝis 4-a eld.: mono] aperas kiel skalo de la prezoj en la samaj kalkulnomoj kiel la varprezoj, do ekz-e unco da oro esprimiĝas same kiel la valoro de tuno da fero en 3 sterlingaj pundoj 17 ŝilingoj 10$^1/_2$ d., oni nomis tiujn ĝiajn kalkulnomojn ĝia monprezo. La stranga ideo estiĝis do, kvazaŭ la oro (resp. arĝento) estus taksata per sia propra materialo kaj, kontraste al ĉiuj aliaj varoj, ricevus de la ŝtato fiksan prezon. Oni fiksis la kalkulnomojn de certaj orpezoj por fiksi la valoron de tiuj pezoj.” (Karl Marx, l.c., p. 52. [vidu MEW, vol. 13, p. 58])

87 Kp „Theorien von der Maßeinheit des Geldes”, en „Zur Kritik der Pol. Oekon. etc.”, p. 53s [saml., p. 59s.] La fantaziojn pri altigo aŭ malaltigo de la „monerprezo”, kiu konsistas en transdoni, per ŝtata aŭtoritato, la leĝajn monnomojn por leĝe fiksitaj pezpartoj de oro aŭ arĝento, al pli grandaj aŭ pli malgrandaj pezpartoj kaj laŭ tio ankaŭ stampi ekz-e $^1/_4$ uncon da oro anstataŭ en 20, estonte en 40 ŝilingoj – tiujn fantaziojn, almenaŭ se ili ne estas mallertaj financoperacioj kontraŭ ŝtataj kaj privataj kreditoroj, sed celas ekonomiajn „miraklokuracojn”, Petty pritraktis tiom detale en „Quantulumcunque concerning Money. To the Lord Marquis of Halifax, 1682”, ke jam liaj rektaj posteuloj, Sir Dudley North kaj John Locke, por eĉ ne paroli pri pli postaj, povis nur banaligi lin. „Se la riĉaĵon de nacio, diras li i.a., eblus dekobligi per dekreto, tiam estus strange ke niaj registaroj ne jam delonge faris tiajn dekretojn.” (l.c., p. 36.)

88 „Aŭ oni devas jam koncedi ke miliono en mono valoras pli ol sama valoro en varoj” (Le Trosne, l.c., p. 919), do „ke valoro valoras pli ol sama alia.”

duktadforto de la laboro elspezendas daŭre por reproduktado de la kvarto da tritiko same multa socia labortempo. Tiu cirkonstanco ne dependas de la volo de la tritikproduktisto nek de tiu de la aliaj varposedantoj. La valorgrando de la varo esprimas do necesan, al ĝia estigprocezo imanentan rilaton al la socia labortempo. Kun la transformiĝo de la valorgrando en prezon tiu necesa rilato aperas kiel interŝanĝrilato de varo kun la monvaro ekzistanta ekster ĝi. Sed en tiu rilato povas esprimiĝi same bone la valorgrando de la varo, kiel la plio aŭ malplio, je kiu ĝi vendeblas sub donitaj cirkonstancoj. La ebleco de kvanta malkongruo inter prezo kaj valorgrando, aŭ la devio de la prezo disde la valorgrando, kuŝas do en la prezformo mem. Tio ne estas manko de tiu formo, sed inverse faras ĝin taŭga formo de produktadmaniero, en kiu la regulo povas trudiĝi nur kiel blinde efikanta mezumleĝo de la senreguleco[89].

La prezformo tamen allasas ne nur la eblecon de kvanta malkongruo inter valorgrando kaj prezo, t.e. inter la valorgrando kaj ĝia propra monesprimo, sed povas gastigi kvalitan kontraŭdiron, tiel ke la prezo entute ĉesas esti valoresprimo, kvankam mono estas nur la valorformo de la varoj. Aĵoj, kiuj per si mem ne estas varoj, ekz-e konscienco, honoro ktp, povas esti, de siaj posedantoj, oferataj por vendo, kaj tiel per sia prezo ricevi varformon. Aĵo povas do formale havi prezon sen havi valoron. La prezesprimo fariĝas ĉi tie imaga, kiel certaj grandoj de matematiko. Aliflanke ankaŭ la imaga prezformo, kiel ekz-e la prezo de la nekultivita grundo, kiu ne havas valoron, ĉar nenia homa laboro estas konkretigita en ĝi, povas kaŝi realan valorrilaton aŭ rilaton derivitan de ĝi[90].

Kiel la relativa valorformo ĝenerale, la prezo esprimas la valoron de varo, ekz-e de tuno da fero, per tio, ke certa kvanto da ekvivalento, ekz-e unco da oro, senpere interŝanĝeblas kun fero, sed tute ne inverse, ke siaflanke la fero estus rekte interŝanĝebla kun oro. Do, por praktike plenumi la efikon de interŝanĝvaloro, la varo devas demeti sian naturan korpon, transformiĝi el nur imagata oro en realan oron, kvankam tiu transsubstanciĝado[91] povas fariĝi al ĝi pli malagrabla ol al la Hegela „nocio” la transiro el la neceso en la liberon aŭ al omaro la krevigo de ĝia ŝelo aŭ al la eklezia patro Hironimo la demetado de la malnova Adamo[92].[93] Apud sia reala formo, fero ekz-e, la varo povas en la prezo posedi idean valorform-

89 *En la franca eld.:* „… nur per la blinda ludo de la malregulecoj kiuj, mezume, reciproke kompensas, paralizas kaj detruas sin.” -vl

90 *En la franca eld.:* „… povas kaŝi rilatojn de realaj valoroj, kvankam malrektajn.” -vl

91 Transsubstanciĝado: esprimo de kristana eklezio, kiu signifas la transformiĝon de pano kaj vino en korpon kaj sangon de Kristo dum la Sankta Manĝo. -vl

on aŭ imagatan orformon, sed ĝi ne povas samtempe esti reale fero kaj vere oro. Por doni al ĝi prezon sufiĉas samigi ĝin kun nur imagata oro. Per oro ĝi estas antstataŭigebla, por ke ĝi plenumu al sia posedanto la servon de ĝenerala ekvivalento. Se la posedanto de la fero alpaŝus ekz-e la posedanton de vendota varo kaj referencus lin al la ferprezo, kiu estas monformo, tiam la varposedanto respondus, kiel en la ĉielo la sankta Petro al Danto, kiu gurdis al li la kredformulon:

*„Assai bene è trascorsa*

*D'esta moneta già la lega e'l peso,*

*Ma dimmi se tu l'hai nella tua borsa.”*

*[„Ja bonege trairis*

*Pistita kaj nepistita greno moneron tiun*

*Sed diru ĉu vi havas ĝin en via monujo.”]*

La prezformo inkludas la vendeblon de la varoj kontraŭ mono kaj la neceson de tiu vendo. Aliflanke mono funkcias kiel idea valormezuro, nur ĉar ĝi vagadas jam en la interŝanĝprocezo, estante monvaro. En la idea mezuro de la valoroj do embuskas jam la reala mono.

## 2. Cirkulilo

### *a) La metamorfozo de la varoj*

Oni vidis, ke la interŝanĝprocezo de la varoj inkludas kontraŭdirajn kaj reciproke ekskludajn rilatojn. La evoluo de la varo ne solvas tiujn kontraŭdirojn, sed kreas la formon en kiu ili povas moviĝi. Tio estas entute la metodo per kiu realaj kontraŭdiroj solviĝas. Ekz-e estas kontraŭdiro, ke

92 *Demeto de la malnova Adamo* estas, laŭ la kristana kredo, la forigo de la hereda prapeko de la homo (Adamo, kiu pekis kontraŭ la ordono de Dio manĝante la frukton de la ekkono, pro kio li estis forpelita el la paradizo), i.a. per kristana bapto. -vl

93 Se Hironimo en sia junaĝo devis multe barakti kun la materia karno, kiel montras lia dezerta batalo kun belaj virinbildoj, tiam maljunaĝe kun la spirita karno. „Mi kredas min, diras li ekz-e, spirite antaŭ la mondjuĝisto.” „Kiu vi estas?” demandas voĉo. „Mi estas kristano.” „Vi mensogas”, tondras la mondjuĝisto. „Vi estas nur ciceronano!”

korpo konstante falas en alian kaj same konstante forfuĝas de ĝi. La elipso estas unu el la moviĝformoj en kiuj tiu kontraŭdiro same realiĝas kiel solviĝas.

Kondiĉe ke la interŝanĝprocezo transigas varojn el la mano, en kiu ili estas ne-uzvaloroj, en la manon, en kiu ili estas uzvaloroj, ĝi estas socia metabolo. La produkto de utila labormaniero anstataŭas alian de utila labormaniero. En la momento, en kiu ĝi alvenas en la loko kie ĝi servas kiel uzvaloro, la varo falas en la sferon de konsumado el la sfero de varinterŝanĝo. Nur tiu lasta interesas nin ĉi tie. Ni devas do rigardi la tutan procezon laŭ la forma flanko, do nur la formŝanĝon aŭ la metamorfozon de la varoj, kiu peras la socian metabolon.

La tute mankhava kompreno de tiu formŝanĝiĝo estas ŝuldata, krom al la malklareco pri la valornocio mem, al la cirkonstanco ke ĉiu formŝanĝiĝo de varo plenumiĝas per interŝanĝo de du varoj, de ordinara varo kaj de monvaro. Se oni retenas sole tiun konkretan punkton, la interŝanĝon de varo kun oro, tiam oni pretervidas ĝuste la videndon, nome tion kio okazas al la formo. Oni pretervidas ke oro kiel nura varo ne estas mono kaj ke la aliaj varoj rilatigas sin mem en siaj prezoj al oro kiel al sia propra monformo.

La varoj eniras unue tiaj kiaj ili estas en la interŝanĝprocezon. Tiu produktas duobligon de la varo en varon kaj monon, eksteran kontraŭdiron, en kiu ili prezentas sian imanentan kontraŭdiron de uzvaloro kaj valoro. En tiu kontraŭdiro la varoj alpaŝas kiel uzvaloroj la monon kiel interŝanĝvaloron. Aliflanke ambaŭ flankoj de la kontraŭdiroj estas varoj, do unuoj de uzvaloro kaj de valoro. Sed tiu unueco de diferencoj prezentiĝas sur ĉiu el la du polusoj inverse kaj per tio prezentas samtempe ilian interrilaton. La varo estas reale uzvaloro, ĝia valor-esto aperas nur idee en la prezo, kiu rilatigas ĝin al la aliflanke staranta oro kiu estas ĝia reala valorformo. Inverse la ormaterialo funkcias nur kiel valormaterialo, mono. Ĝi estas do reale interŝanĝvaloro. Ĝia uzvaloro aperas jam nur idee en la vico de la relativaj valoresprimoj, en kiuj ĝi rilatigas sin al la kontraŭe starantaj varoj kiel al la medio de siaj realaj uzformoj. Tiuj kontraŭdiraj formoj de la varoj estas la realaj moviĝformoj de ilia interŝanĝprocezo.

Ni akompanu nun iun ajn varposedanton, ekz-e nian malnovan konaton teksisto, al la scenejo de la interŝanĝprocezo, la varbazaro. Lia varo, 20 ulnoj da tolo, estas preze difinita. Ĝia prezo estas 2 sterlingaj pundoj. Li interŝanĝas ĝin kontraŭ 2 sterlingaj pundoj kaj, kiel ulo de malnovaj

kutimoj, ree interŝanĝas la 2 sterlingajn pundojn kontraŭ sampreza familia biblio. La tolo, por li nur varo, valorportanto, estas forigita kontraŭ oro, ĝia valorformo, kaj el tiu formo reforigita kontraŭ alia varo, la biblio, kiu tamen kiel uzobjekto devas migri en la teksisthejmon kaj tie kontentigi edifajn bezonojn. La interŝanĝprocezo de la varo okazas do en du kontraŭaj kaj sin reciproke kompletigajn metamorfozojn – transformiĝo de la varo en monon kaj ĝia retransformiĝo el mono en varon.[94] La du fazoj de la varmetamorfozo estas samtempe komercaj agoj de la varposedanto – vendo, interŝanĝo de la varo kun mono; aĉeto, interŝanĝo de la mono kun varo, kaj unueco de ambaŭ agoj: vendi por aĉeti.

Se la teksisto nun rigardas la finan rezulton de sia komerco, li posedas biblion anstataŭ tolon, anstataŭ sia origina varo alian de sama valoro sed de diversa utilo. Same li alproprigas al si siajn ceterajn viv- kaj produktad-rimedojn. El lia vidpunkto la tuta procezo peras nur la interŝanĝon de lia laborprodukto kun fremda laborprodukto, la produktinterŝanĝon.

La interŝanĝprocezo de la varo okazas do en la sekva formŝanĝiĝo:

varo – mono – varo.
vr – m – vr.

Laŭ sia konkreta enhavo la moviĝo vr – vr estas interŝanĝo de varo kontraŭ varo, metabolo de la socia laboro, en kies rezulto la procezo mem estingiĝas.

**vr – m. Unua metamorfozo de la varo aŭ vendo.** La transsalto de la varvaloro el la varkorpo en la orkorpon estas, kiel mi nomis ĝin aliloke[95], la saltomortalo de la varo. Se ĝi malsukcesas, tiam estas trompita ne la varo, sed ja la varposedanto. La socia divido de la laboro faras lian laboron same maldiversa kiel liajn bezonojn diversaj. Ĝuste pro tio lia produkto servas al li nur kiel interŝanĝvaloro. Ĝeneralan socie validan ekvivalentformon ĝi tamen ricevas nur en la mono, kaj la mono troviĝas en fremda poŝo. Por eltiri ĝin, la varo devas esti antaŭ ĉio uzvaloro por la monposedanto, la laboro elspezita por ĝi devas do esti elspezita en socie utila formo aŭ pruviĝi kiel membro de la socia labordivido. Sed la labordivido estas natureca produktadorganismo, kies fadenoj estis teksitaj malantaŭ la dorso de la varproduktantoj kaj plu teksataj. Eble la varo

94 „Sed el la … fajro fariĝas ĉio, diras Heraklito, kaj fajro el ĉio, same kiel el oro havaĵoj kaj el havaĵoj oro.” (F. Lasalo: „Die Philosophie Herakleitos des Dunkeln”, Berlino 1858, vol. I, p. 222.) La noto de Lasalo pri tiu tekstero, p. 224, n-ro 3, klarigas la monon malĝuste kiel nuran valorsignon.

95 Vd MEW, vol. 13, p. 71.

estas produkto de nova labormaniero, kiu pretendas kontentigi nove estiĝintan bezonon aŭ volas mem eĉ estigi bezonon. Aparta laborplenumado, hieraŭ ankoraŭ funkcio inter la multaj funkcioj de unu sama varproduktanto, hodiaŭ disiĝas el tiu kunteksto, memstariĝas kaj ĝuste pro tio sendas siajn produktoparton kiel memstaran varon al la merkato. La cirkonstancoj povas esti maturaj aŭ ne por tiu disiĝprocezo. La produkto kontentigas hodiaŭ socian bezonon. Morgaŭ ĝi estos eble tute aŭ parte deŝovata de simila produktspeco el sia loko. Kvankam la laboro, kiel tiu de nia teksisto, estas patentita membro de la socia labordivido, per tio la uzvaloro ĝuste de liaj 20 ulnoj da tolo estas ankoraŭ tute ne garantiita. Se la socia bezono je tolo, kaj tio havas sian mezuron kiel ĉio alia, estas jam kontentigita per konkurencaj teksistoj, la produkto de nia amiko fariĝas plusa, superflua kaj per tio senutila. Kvankam donacon pri difektoj oni ne esploras, li ne venas al la bazaro por fari donacojn. Sed ni supozu ke la uzvaloro de lia produkto pruviĝas kaj pro tio la varo altiras monon. Sed nun leviĝas la demando, kiom da mono? La respondo estas tamen jam anticipita en la prezo de la varo, la eksponento de ĝia valorgrando. Ni ne konsideru eventualajn kalkulerarojn de la varposedanto, kiuj en la bazaro estas tuj korektataj. Ni supozu ke li elspezis por sia produkto nur la socie necesan mezumon da labortempo. La prezo de la varo estas do nur monnomo de la en ĝi konkretigita kvanto da socia laboro. Sed sen la permeso kaj malantaŭ la dorso de nia teksisto la delonge garantiitaj produktadkondiĉoj de teksado ekfermentis. Kio hieraŭ estis sen ajna dubo socie necesa labortempo por produktado de ulno da tolo, hodiaŭ ĉesas esti tia, kaj tion la monposedanto plej diligente demonstras el la prezkvotadoj de diversaj konkurentoj de nia amiko. Malbonŝance por li, ekzistas multaj teksistoj en la mondo. Ni supozu fine, ke ĉiu peco da tolo kiu troviĝas merkate entenas nur socie necesan labortempon. Malgraŭ tio la ĉioma sumo de tiuj pecoj povas enteni superflue elspezitan labortempon. Se la merkatstomako ne povas sorbi la tutan kvanton da tolo, je la normala prezo de po 2 ŝilingoj por ulno, tiam tio pruvas ke tro granda parto de la socia ĉiomlabortempo estis elspezita en formo de teksado. La efiko estas la sama kiel se ĉiu unuopa teksisto aplikintus pli ol la socie necesan labortempon al sia individua produkto. Jen oni diras: Kunkaptita, kunpendumita[96]. Ĉia tolo en la merkato konsideratas nur kiel komerca artiklo, ĉiu peco nur kiel proporcia peco. Kaj efektive la valoro de ĉiu individua ulno estas ja ankaŭ nur la materiiĝo de tiu sama socie determinita kvanto de samspeca homa laboro.[97]

96 Germana proverbo. -vl

97 [En letero de la 28-a de novembro 1878 al N. F. Danielson, la rusa tradukisto

Oni vidas, la varo amas la monon, sed „la vojo de vera amo neniam ebenas”[98]. Same naturece hazarda kiel la kvalita estas la kvanta strukturo de la socia produktadorganismo, kiu prezentas siajn disajn membrojn[99] en la sistemo de la labordivido. Niaj varposedantoj do malkovras, ke la sama labordivido kiu faras ilin sendependaj privatproduktantoj, kiu igas la socian produktadprocezon kaj iliajn rilatojn en tiu procezo sendependaj de ili mem, ke la sendependeco de la personoj unu de la alia kompletiĝas en sistemo de ĉiuflanka dependeco trudata de la aĵoj.

La labordivido transformas la laborprodukton en varon kaj per tio necesigas ties transfomon en monon. Ĝi samtempe igas hazarda, ĉu tiu transsubstancigo sukcesas. Ĉi tie ni devas tamen konsideri la fenomenon en ĝia pureco, do supozi ĝian normalan okaziĝon. Cetere se ĝi entute okazas, se la varo do ne estas nevendebla, ĝia formŝanĝiĝo okazas ĉiam, kvankam nenormale en tiu formŝanĝiĝo substanco – valorgrando eblas perdiĝi aŭ aldoniĝi.

Al la unua varposedanto oro anstataŭas lian varon, kaj al la alia, varo lian oron. La perceptebla fenomeno estas la man- aŭ lok-ŝanĝiĝo de varo kaj mono, de 20 ulnoj da tolo kaj 2 sterlingaj pundoj, do ilia interŝanĝo. Sed per kio la varo interŝanĝiĝas? Per sia ĝenerala valorformo. Kaj per kio la oro? Per aparta formo de sia uzvaloro. Kial la oro alpaŝas la tolon? Ĉar ĝia prezo de 2 sterlingaj pundoj aŭ ĝia monnomo jam rilatigas ĝin al oro kiel mono. La forigo de la origina varformo plenumiĝas per la vendo de la varo, t.e. en la momento en kiu ĝia uzvaloro efektive altiras la en ĝia prezo nur imagitan monon. La realigo de la prezo aŭ de la nur idea valorformo de la varo estas do samtempe inverse realigo de la nur idea uzvaloro de la mono, la transformiĝo de varo en monon samtempe transformiĝo de mono en varon. Tiu unu sola procezo estas duflanka procezo, de la poluso de la varposedanto vendo, de la kontraŭpoluso de la monposedanto aĉeto. Aŭ vendo estas aĉeto, vr – m samtempe m – vr.[100]

de la „Kapitalo”, Markso ŝanĝas la lastan frazon jene: „Kaj efektive la valoro de ĉiu individua ulno estas ja ankaŭ nur la materiiĝo de parto de en la ĉiom-kvanton da ulnoj elspezita socia laborkvanto.” La sama korekto troviĝas ankaŭ en la persona ekzemplero de Markso, tiu de la dua germana eldono de la 1-a volumo de la „Kapitalo”, sed ne de lia mano.]

98 *En la originalo citaĵo en la angla: „the course of true love never does run smooth”* (Ŝekspiro). -vl

99 *En la originalo latine:* „membra disjecta”. -vl

100 *„Ĉiu vendo estas aĉeto”* (D-ro Quesnay: „Dialogues sur le Commerce et les Travaux des Artisans”, [en] „Physiocrates”, éd. Daire, I. Partie, Parizo 1846, p. 170), aŭ, kiel Quesnay diras en siaj „Maximes Générales”: „Vendi estas

Ĝis nun ni konas nenian alian ekonomian rilaton de la homoj krom tiun de varposedantoj, rilaton en kiu ili aplroprigas al si fremdan laborprodukton, per tio ke ili fremdigas propran. Pro tio, iu povas alpaŝi varposedanton nur kiel monposedanto, ĉu ĉar lia laborprodukto posedas de naturo la monformon, do estas monmaterialo, oro ktp, ĉu ĉar lia propra varo jam deĵetis sian haŭton kaj demetis sian originan uzformon. Por funkcii kiel mono, la oro devas kompreneble ĉe iu punkto eniri la varmerkaton. Tiu punkto troviĝas ĉe ĝia produktfonto, kie ĝi interŝanĝiĝas kiel rekta laborprodukto kun alia laborprodukto de sama valoro. Sed ekde tiu momento ĝi prezentas konstante realigatajn varprezojn.[101] Senkonsidere la interŝanĝon de oro kun varo ĉe ĝia produktfonto, la oro en la mano de ĉia varposedanto estas la fremdigita formo de lia vendita varo, produkto de la vendo aŭ de la unua varmetamorfozo vr – m.[102] La oro fariĝis idea mono aŭ valormezuro, ĉar ĉiuj varoj mezuris siajn valorojn en ĝi kaj tiel faris ĝin la imagita kontraŭparto de ilia uzformo, faris ĝin ilia valorformo. Ĝi fariĝas reala mono, ĉar la varoj per sia ĉiuflanka fremdiĝo faras ĝin sia reale eksteriĝinta aŭ transformiĝinta uzformo kaj pro tio sia reala valorformo. En sia valorformo la varo demetas ĉian spuron de sia natureca uzvaloro kaj de la aparta utila laboro al kiu ĝi dankas sian estiĝon, por pupiĝi en la unuforman socian materiecon de sendistinga homa laboro. Pro tio oni ne vidas ĉe la mono la specon de la en ĝin transformita varo. Iu varo aspektas en sia monformo ĝuste same kiel la alia. Mono povas pro tio esti koto, kvankam koto ne estas mono. Ni supozu ke la du ormoneroj, por kiuj nia teksisto vendis sian varon, estas la transformita formo de kvarto da tritiko. La vendo de la tolo, vr – m, estas samtempe ilia aĉeto, m – v. Sed tiu ĉi procezo – vendo de la tolo – komencas moviĝon kiu finiĝas per sia malo, per la aĉeto de la biblio; kiel aĉeto de la tolo ĝi finas moviĝon kiu komenciĝis per sia malo, per la vendo de la tritiko. vr – m (tolo – mono), tiu unua fazo de vr – m – vr (tolo – mono – biblio), estas samtempe m – vr (mono – tolo), la lasta fazo de alia moviĝo vr – m – vr (tritiko – mono – tolo). La unua metamorfozo de varo, ĝia transformiĝo el la varformo en monon, estas ĉiam samtempe dua kontraŭa metamorfozo de alia varo, ĝia retransformiĝo el la monformo en varon.[103]

aĉeti".

101 „La prezo de varo pageblas nur per la prezo de alia varo." (Mercier de la Rivière: „L'Ordre naturel et essentiel des sociétés politiques", [en] „Physiocrates", éd. Daire, p. 554.)

102 „Por havi tiun monon, oni devas esti vendinta." (l.c., p. 543.)

103 Escepto, kiel antaŭe rimarkigite, estas la or- respektive arĝent-produktisto, kiu interŝanĝas sian produkton sen esti ĝin antaŭe vendinta.

**m – v. Dua aŭ fina metamorfozo de la varo: aĉeto.** Ĉar mono estas la eksterigita formo de ĉiaj aliaj varoj aŭ la produkto de ilia ĝenerala fremdigo, ĝi estas la absolute fremdigebla varo. Ĝi legas ĉiujn prezojn retroe kaj tiel speguliĝas en ĉiuj varkorpoj kiel la sin fordonema materialo de sia propra variĝo. Samtempe la prezoj, tiuj am-okuloj, per kiuj la varoj okulumas al ĝi, montras la limon de ĝia transformkapablo, nome ĝian propran kvanton. Ĉar la varo en sia moniĝo malaperas, oni ne vidas ĉe la mono kiel ĝi alvenis en la manojn de sia posedanto aŭ kio estas en ĝi transformita. Non olet <Ĝi ne fetoras>, de kie ajn ĝi devenas. Unuflanke ĝi reprezentas venditan varon, aliflanke aĉeteblan varon.[104]

m – vr, la aĉeto, estas samtempe vendo, vr – m; la lasta metamorfozo de varo do samtempe la unua metamorfozo de alia varo. Por nia teksisto la biografio de lia varo finiĝas per la biblio, en kiun li retransformis la 2 sterlingajn pundojn. Sed la biblivendisto transformas la 2 sterlingajn pundojn, ricevitajn de la teksisto, en grenbrandon. m – v, la fina fazo de vr – m – vr (tolo – mono – biblio), estas samtempe vr – m, la unua fazo de vr – m – vr (biblio – mono – grenbrando). Ĉar la varproduktisto liveras nur unuflankan produkton, li vendas ĝin ofte en pli grandaj kvantoj, dum liaj multflankaj bezonoj devigas lin konstante disspliti la realigitan prezon aŭ la ricevitan monsumon en multnombrajn aĉetojn. Unu vendo kondukas pro tio en multajn aĉetojn de diversaj varoj. La fina metamorfozo de varo konsistigas tiel sumon de unuaj metamorfozoj de aliaj varoj.

Se ni rigardas nun la tutan metamorfozon de varo, ekz-e de la tolo, tiam ni vidas unue, ke ĝi konsistas el du kontraŭaj kaj reciproke sin kompletigantaj sociaj procezoj de la varposedanto kaj speguliĝas en du kontraŭaj ekonomiaj karakteroj de li. Kiel aganto de vendo li fariĝas vendisto, kiel aganto de aĉeto aĉetisto. Sed kiel en ĉiu transformiĝo de la varo ĝiaj ambaŭ formoj, varformo kaj monformo, ekzistas samtempe, sed ĉe kontraŭaj polusoj, tiel kontraŭ la varposedanto kiel vendanto staras alia aĉetanto kaj kiel aĉetanto alia vendanto. Kiel la sama varo trairas sinsekve la du inversajn transformiĝojn, el varo fariĝas mono kaj el mono varo, tiel la sama varposedanto ŝanĝas la rolojn de vendanto kaj aĉetanto. Tiuj karakteroj estas do ne fiksaj, sed ene de la varcirkulado ili ŝanĝas konstante la personojn.

104„Se la mono en nia mano prezentas la aĵojn kiujn ni povas deziri aĉeti, tiam ĝi prezentas ankaŭ la aĵojn kiujn ni vendis por tiu mono.” (Mercier de la Rivière, l.c. p. 586.)

La entuta metamorfozo de varo supozigas, en sia plej simpla formo, kvar ekstremojn kaj tri rolludantojn. Unue al la varo alpaŝas la mono kiel ĝia valor-formo, kiu posedas transe, en fremda poŝo, aĵe malmolan realecon. Tiel al la varposedanto alpaŝas monposedanto. Ekde kiam nun la varo estas transformiĝinta en monon, tiu fariĝas ĝia malaperanta ekvivalentformo, kies uzvaloro aŭ enhavo ĉi-flanke ekzistas en aliaj varkorpoj. Kiel finpunkto de la unua vartransformiĝo la mono estas samtempe elirpunkto de la dua. Tiel la vendanto de la unua ago fariĝas aĉetanto en la dua, kie tria varposedanto alpaŝas lin kiel vendanto.[105]

La du inversaj moviĝfazoj de la varmetamorfozo konsistigas cirkuladon: varformo, demeto de la varformo, reveno al varformo. Tamen la varo mem estas ĉi tie kontraŭece determinita. Ĉe la elirpunkto ĝi estas neuzvaloro, ĉe la finpunkto uzvaloro por sia posedanto. Tiel la mono aperas unue kiel la fiksa valorkristalo, en kiun la varo transformiĝas, por poste disflui kiel ĝia nura ekvivalentformo.

La du metamorfozoj kiuj konsistigas la cirkuladon de varo, konsistigas samtempe partajn metamorfozojn de du aliaj varoj. La sama varo (tolo) malfermas la serion de siaj propraj metamorfozoj kaj fermas la entutan metamorfozon de alia varo (de la tritiko). Dum ĝia unua transformiĝo, la vendo, ĝi ludas tiujn du rolojn en propra persono. Kiel orkrizalido, male, en kiun ĝi mem iras la vojon de ĉia karno, ĝi finas samtempe la unuan metamorfozon de tria varo. La cirkulado, kiun priskribas la metamorfozserio de ĉia varo, implikiĝas do nemalimplikeble kun la cirkuladoj de aliaj varoj. La ĉioma procezo prezentiĝas kiel varcirkulado.

La varcirkulado estas ne nur formale, sed esence diversa de la senpera produktinterŝanĝo. Oni ĵetu nur rerigardon al la okazaĵo. La teksisto nepre interŝanĝis tolon kun biblio, propran varon kun fremda. Sed tiu fenomeno estas vera nur por li. La biblio-aganto, kiu preferas ion varmegan al io malvarmeta, tute ne pensis interŝanĝi tolon por biblio, kiel la teksisto ne scias pri tio ke tritiko estis interŝanĝita kontraŭ lia tolo ktp. La varo de B anstataŭas la varon de A, sed A kaj B ne interŝanĝas siajn varojn. Povas efektive okazi, ke A kaj B aĉetas reciproke unu de la alia, sed tia aparta rilato tute ne estas kondiĉita de la ĝeneralaj rilatoj de la varcirkulado. Unuflanke oni vidas ĉi tie, kiel la varinterŝanĝo trarompas la individuajn kaj lokajn barojn de la senpera produktinterŝanĝo kaj kiel la metabolo de la homa laboro evoluas. Aliflanke disvolviĝas tuta cirklo de sociaj naturaj

105 „Laŭ tio ekzistas kvar finpunktoj kaj tri intertraktad-partneroj, el kiuj unu intervenas dufoje.” (Le Trosne, l.c., p. 909.)

interligitecoj kiuj estas nekontroleblaj de la agantaj personoj. La teksisto povas vendi tolon nur ĉar la kampulo jam vendis tritikon, la varmemulo la biblion nur ĉar la teksiso tolon, la distilisto nur ardan akvon ĉar la alia jam vendis la akvon de la eterna vivo, ktp.

La cirkuladprocezo pro tio ankaŭ ne estingiĝas, kiel ja la senpera produktinterŝanĝo, per la lok- aŭ man-ŝanĝo de la uzvaloroj. La mono ne malaperas, ĉar ĝi fine elfalas el la metamorfoz-serio de iu varo. Ĝi ĉiam ĵetiĝas sur cirkuladloko liberigata de la varoj. Ekz-e en la kompleta metamorfozo de la tolo (tolo – mono – biblio) unue la tolo elfalas el la cirkulado, mono metas sin en ĝian lokon, poste la biblio elfalas el la cirkulado, mono metas sin en ĝian lokon. La anstataŭado de varo per varo metas samtempe la monvaron[106] en trian manon. La cirkulado konstante elŝvitas monon.

Nenio povas esti pli ridinda ol la dogmo, laŭ kiu la varcirkulado kondiĉas nepran ekvilibron de la vendoj kaj aĉetoj, ĉar ĉiu vendo estas aĉeto kaj inverse. Se tio volas diri ke la nombro da reale faritaj vendoj estas sama kiel la sama nombro da aĉetoj, tiam ĝi estas plata taŭtologio. Sed ĝi volas pruvi ke la vendisto surmerkatigas sian propran aĉetiston. Vendo kaj aĉeto estas identa ago kiel interrilato inter du poluse kontraŭaj personoj, la varposedanto kaj la monposedanto. Ili formas du poluse kontraŭajn agojn kiel agojn de la sama persono. La identeco de vendo kaj aĉeto inkludas pro tio, ke la varo fariĝas senutila, se ĝi, ĵetita en la alĥemian retorton de cirkulado, ne elvenas kiel mono, ne estas vendata de la varposedanto, do aĉetata de la monposedanto. Tiu identeco entenas krome, ke la procezo, se ĝi sukcesas, konsistigas ripozpunkton, vivetapon de la varo, kiu povas daŭri pli ol malpli longe. Ĉar la unua metamorfozo de la varo estas samtempe vendo kaj aĉeto, tiu parta procezo estas samtempe memstara procezo. La aĉetinto havas la varon, la vendinto havas la monon, t.e. varon kiu konservas cirkuladkapablan formon, kiom ajn frue aŭ malfrue ĝi reaperas sur la merkato. Neniu povas vendi sen ke iu alia aĉetas. Sed neniu devas tuj aĉeti ĉar li mem vendis. La cirkulado rompas la tempajn, lokajn kaj individuajn barojn de la rekta produktinterŝanĝo ĝuste per tio ke ĝi fendas la tie ekzistantan rektan identecon inter la forcedo de la propra kaj la akiro de la fremda laborprodukto en la kontraŭecon de vendo kaj aĉeto.[107] Ke la procezoj, kiuj alpaŝas unu la alian

106 *Noto al la 2-a eld.:* Kvankam tiu fenomeno esta mane palpebla, ĝi esta tamen plej ofte pretervidata de politikaj ekonomikistoj, nome de la vulgara liberkomercisto.

107 *En la franca eldono sekvas:* „Post esti vendinta, mi ne devas aĉeti, nek en la

memstare, konsistigas internan unuon, signifas same, ke ilia interna unueco moviĝas en eksteraj kontraŭecoj. Se la ekstera sendependiĝo de la interne nesendependaj, ĉar reciproke sin kompletigaj procezo daŭras ĝis certa punkto, tiam la unueco perforte rimarkigas per – krizo. La al la varo esence propra kontraŭdiro de uzvaloro kaj valoro, de privata laboro, kiu devas samtempe prezentiĝi kiel rekte socia laboro, de aparta konkreta laboro, kiu validas samtempe nur kiel abstrakte ĝenerala laboro, de personigo de la aĵo kaj aĵigo de la personoj – tiu esence propra kontraŭdiro ricevas en la kontraŭecoj de la varmetamorfozo siajn evoluintajn moviĝformojn. Tiuj formoj inkludas pro tio la eblecon, sed ankaŭ nur la eblecon, de krizoj. La evoluo de tiu ebleco al realaĵo postulas tutan serion da kondiĉoj, kiuj el vidpunkto de la simpla varcirkulado ankoraŭ tute ne ekzistas.[108]

Kiel peranto de la varcirkulado la mono ricevas la funkcion de cirkuladrimedo[109].

## b) La cirkulado de la mono

La formŝanĝo, per kiu la metabolo de la laborproduktoj plenumiĝas, vr – m – vr, kondiĉas ke la sama valoro en formo de varo estu la elirpunkto de la procezo kaj revenu al tiu punkto en formo de varo. Tiu moviĝo de la varoj estas do cirkulado. Aliflanke la sama formo ekskludas la cirkuladon de la mono. Ĝia rezulto estas konstanta forigo de la mono de ĝia elirpunk-

sama loko, nek en la sama tempo, nek de la sama homo al kiu mi vendis. Estas vere ke la aĉeto estas la nepra kompletigo de la vendo, sed ankaŭ veras ke ilia unueco estas la unueco de kontraŭaĵoj. -vl

108 Komparu miajn rimarkojn pri James Mill, „Kontribuaĵo al la kritiko ktp.”, p. 74-76. Du punktoj estas ĉi tie karakterizaj por la metodo de la ekonomika apologetiko. Unue la identigo de varcirkulado kaj senpera produktinterŝanĝo per simpla abstraktigo de iliaj diferencoj. Due la provo fornei la kontraŭdirojn de la kapitalisma produktadprocezo per tio ke oni dissolvas la rilatojn de ĝiaj produktadagantoj en la simplajn rilatojn kuj fontas el la varcirkulado. Sed varproduktado kaj varcirkulado estas fenomenoj kiuj apartenas al la plej diversaj produktadmanieroj, kvankam en diversaj amplekso kaj atingopovo. Oni do scias ankoraŭ nenion pri la karakteriza diferenco de tiuj produktadmanieroj kaj do ne povas prijuĝi ilin, se oni konas nur la abstraktajn kategoriojn de la varcirkulado kiuj estas al ili komunaj. En nenia scienco krom la politika ekonomio regas tiom granda fanfaronado per elementa trivialaĵo. Ekz-e J. B. Say arogas al si juĝi pri krizoj, ĉar li scias ke la varo estas produkto.

109 Alia vorto: cirkulilo. -vl

to, ne reveno al ĝi. Tiom longe, kiom la vendinto retenas la transformitan formon de sia varo, la monon, la varo troviĝas en la stadio de la unua metamorfozo aŭ plenumis nur sian unuan cirkuladduonon. Kiam la procezo, vendi por aĉeti, estas kompletigita, tiam ankaŭ la mono estas ree forigita el la mano de sia origina posedinto. Tamen, kiam la teksisto, post aĉeti la biblion, denove vendas tolon, ankaŭ la mono revenas en lian manon. Sed ĝi ne revenas pro la cirkulado de la unuaj 20 ulnoj da tolo, per kiu ĝi estas ja forigita el la manoj de la teksisto en tiun de la bibli-vendisto. Ĝi revenas nur per renovigo aŭ ripeto de la sama cirkuladpro-cezo por nova varo kaj finiĝas ĉi tie kiel tie per la sama rezulto. La moviĝformo senpere donita al la mono per la varcirkulado estas do ĝia konstanta malproksimiĝo de la elirpunkto, ĝia irado de la mano de varposedanto en tiun de alia, aŭ ĝia cirkulado (*currency, cours de la monnaie*).

La cirkulado de la mono montras konstantan, monotonan ripetiĝon de la sama procezo. La varo staras ĉiam ĉe la flanko de la vendanto, la mono ĉiam ĉe la flanko de la aĉetanto, kiel aĉetilo. Ĝi funkcias kiel aĉetilo, per tio ke ĝi realigas la prezon de la varo. Per tio ke ĝi realigas ĝin, ĝi trans-igas la varon el la mano de la vendanto, dum ĝi samtempe malproksim-iĝas el la mano de la aĉetanto en tiun de la vendanto, por ripeti la saman procezon kun alia varo. La fakto, ke tiu unuflanka formo de la monmov-iĝo fontas el la duflanka formmoviĝo de la varo, estas vualita. La naturo de la varcirkulado mem produktas la kontraŭan ŝajnon. La unua meta-morfozo de la varo videblas ne nur kiel moviĝo de la mono, sed kiel ĝia propra moviĝo, sed ĝia dua metamorfozo videblas nur kiel moviĝo de la mono. En ĝia unua cirkuladduono la varo interŝanĝas sian lokon kun la mono. Per tio ĝia uzformo samtempe elfalas el la cirkulado, en la kon-sumadon.[110] Ĝia valorformo aŭ monlarvo paŝas en ĝian lokon. La duan cirkuladduonon ĝi jam ne trairas en sia propra naturhaŭto, sed en sia orhaŭto. La kontinueco de la moviĝo falas do komplete sur la flankon de la mono, kaj la sama moviĝo, kiu inkludas por la varo du kontraŭajn procezojn, inkludas kiel propra moviĝo de la mono ĉiam la saman pro-cezon, ĝian lokŝanĝon kun ĉiam alia varo. La rezulto de la varcirkulado, anstataŭigo de varo per alia varo, ŝajnas perata ne de ĝia propra form-ŝanĝo, sed per la funkciado de la mono kiel cirkuladrimedo, kiu cirkuligas la per si mem senmovajn varojn, transigas ilin el la mano, en kiu ili estas ne-uzvaloroj, en la manon, en kiu ili estas uzvaloroj, ĉiam en direkto

110 Eĉ se la varo estas ree kaj ree vendata, fenomeno kiu ĉi tie ankoraŭ ne ekzistas por ni, ĝi falas per la lasta definitiva vendo el la sfero de la cirkulado en tiun de la konsumado, por tie servi kiel vivrimedo aŭ kiel produktadrimedo.

kontraŭa al sia propra mon-irado. Ĝi konstante malproksimigas la varojn el la cirkuladsfero, per tio ke ĝi metas sin konstante en la lokon de ilia cirkulado kaj per tio malproksimiĝas de sia propra elirpunkto. Do, kvankam la monmoviĝo estas nur esprimo de la varcirkulado, la varcirkulado ŝajnas inverse esti nur rezulto de la monmoviĝo.[111]

Aliflanke la mono akiras la funkcion de cirkuladrimedo nur, ĉar ĝi estas la sendependiĝinta valoro de la varoj. Ĝia moviĝo kiel cirkuladrimedo estas do efektive nur ĝia propra formmoviĝo. Tiu devas do speguliĝi ankaŭ palpeble en la cirkulado de la mono. Tiel ekz-e la tolo transformas unue sian varformon en sian monformon. La lasta ekstremo de ĝia unua metamorfozo vr – m, la monformo, fariĝas poste la unua ekstremo de ĝia lasta metamorfozo m – vr, ĝia retransformiĝo en la biblion. Sed ĉiu el tiuj du formŝanĝoj plenumiĝas per interŝanĝo inter varo kaj mono, per ilia reciproka lokŝanĝo. La samaj moneroj venas kiel fremdigita[112] formo de la varo en la manon de la vendanto kaj forlasas ĝin kiel absolute fremdigebla[113] formo de la varo. Ili ŝanĝas dufoje la lokon. La unua metamorfozo de la tolo venigas tiujn monerojn en la poŝon de la teksisto, la dua eligas ilin. La du kontraŭaj formŝanĝoj de la sama varo speguliĝas do en la dufoja lokŝanĝo de la mono en kontraŭa direkto.

Aliflanke, se okazas nur unufazaj varmetamorfozoj, nuraj vendoj aŭ nuraj aĉetoj, respektive, tiam la sama mono ŝanĝas ankaŭ nur unufoje la lokon. Ĝia dua lokŝanĝo esprimas ĉiam la duan metamorfozon de la varo, ĝian retransformiĝon el mono. En la multa ripetado de la lokŝanĝo de la moneroj respeguliĝas ne nur la metamorfozvico de unu sola varo, sed ankaŭ la implikiĝo de la sennombraj metamorfozoj de la varmondo entute. Estas cetere tute memkomprenebla, ke ĉio ĉi validas nur por la ĉi tie konsiderata formo de la simpla varcirkulado.

Ĉiu varo, ĉe sia unua paŝo en la cirkuladon, ĉe sia unua formŝanĝiĝo, elfalas el la cirkulado, en kiun ĉiam eniras nova varo. La mono, male, kiel cirkuladrimedo, hejmas konstante en la cirkuladsfero kaj konstante vagabundadas en ĝi. Leviĝas do la demando, kiom da mono tiu sfero konstante sorbas.

111 „Ĝi (la mondo) havas nenian alian moviĝon ol tiun kiun donas al ĝi la produktoj.” (Le Trosne, l.c., p. 885.)

112 *Originale:* „entäußerte Gestalt” – hegela esprimo por „fordonita formo”, aŭ „senigita formo”, en la angla: „alienated”. -vl

113 *Originale:* „veräußerliche Gestalt” – hegela esprimo por „fordonebla”, „forigebla”, „senigebla” formo, en la angla versio: „alienable”. -vl

En lando okazas ĉiutage multaj, samtempaj kaj pro tio space apudirantaj unuflankaj varmetamorfozoj, aŭ per aliaj vortoj, nuraj vendoj ĉe unu flanko, nuraj aĉetoj ĉe la alia. En siaj prezoj la varoj estas jam egaligitaj al certaj imagitaj monkvantoj. Ĉar la ĉi tie konsiderata senpera cirkuladformo ĉiam korpe alfrontigas varon kaj monon, unu ĉe la poluso de vendo, la alian sur la kontraŭpoluso de aĉeto, la por la cirkuladprocezo de la varmondo bezonata kvanto da cirkuladrimedoj estas jam determinita per la prezsumo de la varoj. Fakte la mono prezentas nur reale la en la prezsumo de la varoj jam idee esprimitan orsumon. La sameco de tiuj sumoj estas do memkomprenebla. Sed ni scias, ke ĉe nevariantaj valoroj de la varoj iliaj prezoj ŝanĝiĝas kun la valoro de la oro (de la monmaterialo) mem, relative kreskas, kiam ĝi falas, kaj falas, kiam ĝi kreskas. Ĉu la prezsumo de la varoj tiel kreskas aŭ falas, la kvanto de la cirkulanta mono devas same kreski aŭ fali. La ŝanĝo en la kvanto de la cirkuladrimedoj fontas ĉi tie tamen el la mono mem, sed ne el ĝia funkcio kiel cirkuladrimedo, sed el sia funkcio kiel valormezurilo. Unue, la prezo de la varoj ŝanĝiĝas inverse al la valoro de la mono, kaj poste la kvanto de la cirkuladrimedoj rekte laŭ la prezo de la varoj. La tute sama fenomeno okazus, se ekz-e ne la valoro de la oro falus, sed arĝento anstataŭus ĝin kiel valormezuro, aŭ se ne la valoro de la arĝento kreskus, sed oro forŝovus ĝin el ĝia funkcio de valormezuro. En la unua kazo, pli da arĝento devus cirkuli ol antaŭe oro, en la alia malpli da oro ol antaŭe arĝento. En ambaŭ kazoj la valoro de la monmaterialo estus ŝanĝiĝinta, t.e. de la varo kiu funkcias kiel mezuro de la valoroj, pro tio la prezesprimo de la varvaloroj, pro tio la kvanto da cirkulanta mono kiu servas por realigo de tiuj prezoj. Oni vidis, ke la cirkuladsfero de la varoj havas truon, tra kiu oro (arĝento, mallonge la monmaterialo) eniras ĝin kiel varo de donita valoro. Tiu valoro estas premisita ĉe la funkciado de la mono kiel valormezuro, do ĉe la prezdeterminado.[114] Se nun ekz-e la valoro de la valormezurilo mem falas, tiam tio aperas unue en la prezŝanĝiĝo de la varoj kiuj estas interŝanĝataj rekte ĉe la produktadfontoj de la noblaj metaloj kun ili kiel varoj. Nome en malpli evoluintaj kondiĉoj de la burĝa socio granda parto de la aliaj varoj estos ankoraŭ dum iom longa tempo taksata en la arĥaiĝinta valoro – kiu nun fariĝis iluzia – de la valormezuro. Tamen unu varo infektas la alian per sia valorrilato al ĝi, la or- aŭ arĝent-prezoj de la varoj iom post iom kompensiĝas per la proporcioj determinataj de iliaj valoroj mem, ĝis kiam fine ĉiaj varvaloroj estas taksataj laŭ la nova valoro de la monmetalo. Tiu kompensad-procezo estas akompanata de la konstanta

114 *En la angla versio aldoniĝas:* „Do, kiam mono ekfunkcias kiel valormezurilo, kiam ĝi esprimas prezojn, ĝia valoro estas jam determinita.” -vl

kresko de la noblaj metaloj kiuj enfluas kiel anstataŭaĵo por la rekte kun ili interŝanĝitaj varoj. Pro tio, en la sama mezuro laŭ kiu la korektita prezdifino de la varoj ĝeneraliĝas – aŭ iliaj valoroj estas taksataj laŭ la nova, falinta kaj ĝis certa punkto daŭre falanta valoro de la metalo –, ankaŭ la plia kvanto necesa por ilia realigo estas jam ekzistanta. Unuflanka observado de la faktoj kiuj sekvis la malkovron de la novaj or- kaj arĝent-fontoj, delogis en la 17-a kaj nome en la 18-a jarcento al la miskonkludo, ke la varprezoj kreskis ĉar pli da oro kaj da arĝento funkciis kiel cirkuladrimedoj. En la sekvo ni supozigas la valoron de la oro kiel donitan, kiel ĝi estas efektive en la momento donita.

Do, sub tiu kondiĉo, la kvanto da cirkuladrimedoj estas determinita per la realigenda prezsumo de la varoj. Se ni nun premisas krome la prezon de ĉia varspeco kiel donitan, tiam la prezsumo de la varoj dependas evidente de la varkvanto troviĝanta en la cirkulado. Ne necesas multa kaprompiĝo por kompreni ke, kiam 1 kvarto da tritiko kostas 2 sterlingajn pundojn, 100 kvartoj 200 sterlingajn pundojn, 200 kvartoj 400 sterlingajn pundojn ktp, kun la kvanto da tritiko do la monkvanto devas kreski, kiu ĉe la aĉeto interŝanĝas la lokon kun ĝi.

Se oni premisas la varkvanton kiel donitan, la kvanto da cirkulanta mono fluas supren kaj malsupren kun la prezŝanĝoj de la varoj. Ĝi kreskas kaj falas, ĉar la prezsumo de la varoj kreskas aŭ malkreskas sekve al ilia prezŝanĝo. Por tio tute ne necesas ke la prezoj de ĉiuj varoj kresku aŭ falu samtempe. La prezaltiĝo de certa nombro da gvidaj artikloj en iu aŭ la malaltiĝo de ilia prezo en la alia kazo sufiĉas por altigi aŭ malaltigi la realigendan prezsumon de ĉiuj cirkulantaj varoj, do ankaŭ cirkuligi pli aŭ malpli da mono. Ĉu la prezŝanĝo de la varoj spegulas realajn valorŝanĝojn aŭ nur fluktuadojn de la merkatprezoj, la efiko sur la kvanto de la cirkuladrimedoj restas la sama.

Estu donita nombro da ne interligitaj, samtempaj kaj pro tio space apude okazantaj vendoj aŭ partaj metamorfozoj, ekz-e de 1 kvarto da tritiko, 20 ulnoj da tolo, 1 biblio, 4 galonoj da grenbrando. Se la prezo de ĉiu artiklo estas 2 sterlingaj pundoj, la realigenda prezsumo do 8 sterlingaj pundoj, tiam monkvanto de 8 sterlingaj pundoj devas eniri la cirkuladon. Se la samaj varoj, male, fariĝas membroj de la al ni konata metamorfozserio: 1 kvarto da tritiko – 2 st.pd. – 20 ulnoj da tolo – 2 st.pd. – 1 biblio – 2 st.pd. – 4 galonoj da grenbrando – 2 st.pd., tiam la samaj 2 sterlingaj pundoj cirkuligas la diversajn varojn laŭvice, per tio ke ili realigas iliajn prezojn laŭvice, do ankaŭ la prezsumon de 8 st.pd., por fine ripozi en la mano de la distilisto. Ili plenumas kvar cirkul-rondojn.

Tiu ripeta lokŝanĝo de la samaj moneroj prezentas la duoblan formŝanĝon de la varo, ĝian moviĝon tra du kontraŭaj cirkuladstadioj kaj la implikiĝon de la metamorfozoj de diversaj varoj.[115] La kontraŭaj kaj reciproke sin kompletigantaj fazoj, tra kiuj tiu procezo okazas, ne povas space apudi nek samtempe okazi[116], sed nur tempe sin sekvi. Tempaj periodoj estas do la mezuro de ĝia daŭro, aŭ la nombro da cirkul-rondiroj de la samaj moneroj en donita tempo mezuras la rapidecon de la moncirkulado. Ni supozu, ke la cirkuladprocezo de tiuj kvar varoj daŭras ekz-e unu tagon. Tiam la realigenda prezsumo estas: 9 st.pd., la nombro da cirkul-rondoj de la samaj moneroj dum la tago: 4 kaj la kvanto de la cirkulanta mono: 2 st.pd., aŭ por donita daŭro de la cirkuladprocezo: (prezsumo de la varoj) / (cirkul-rondoj de samnomaj moneroj) = kvanto da mono funkcianta kiel cirkuladrimedo. Tiu leĝo validas ĝenerale. La cirkuladprocezo de iu lando en donita daŭro entenas ja unuflanke multajn disajn, samtempe kaj space apude okazantajn vendojn (respektive aĉetojn) aŭ partajn metamorfozojn, en kiuj la samaj moneroj ŝanĝas la lokon nur unufoje aŭ faras nur unu cirkulad-rondon, aliflanke multajn parte apude okazantajn, parte inter si implikitajn pli aŭ malpli membroriĉajn metamorfozseriojn, en kiuj la samaj moneroj plenumas pli aŭ malpli da cirkuladrondojn. La entuta nombro da cirkuladrondoj de ĉiuj cirkulantaj samnomaj moneroj rezultigas tamen la mezuman nombron da cirkuladrondoj de la unuopa monero aŭ la mezuman rapidecon de la moncirkulado. La monkvanto, kiu ĉe la komenco ekz-e de la ĉiutaga cirkuladprocezo estas ĵetita en ĝin, estas kompreneble determinita per la prezsumo de la samtempe kaj space unu apud la alia cirkulantaj varoj. Sed ene de la procezo unu monero estas por tiel diri respondecigata por la alia. Se unu akcelas sian cirkuladrapidon, tiam lamiĝas tiu de la alia, aŭ ĝi komplete elpuŝiĝas el la cirkuladsfero, ĉar tiu povas sorbi nur orkvanton kiu, obligita per la mezuma nombro da cirkulad-rondoj de ĝia unuopa elemento, egala al la realigenda prezsumo. Pro tio, se la nombro da cirkuladrondoj de la moneroj kreskas, tiam ĝia cirkulanta kvanto malkreskas. Se la nombro da iliaj cirkuladrondoj malkreskas, tiam kreskas ilia kvanto. Ĉar la kvanto de la mono, kiu povas funkcii kiel cirkuladrimedo, estas donita ĉe donita mezuma rapideco, oni bezonas do ekz-e ĵeti en la cirkuladon nur certan kvanton da unupundaj notoj por elĵeti same multajn unupundaj biletoj – artaĵo bone konata de

115„Estas la produktoj, kiuj ĝin (la monon) movas kaj cirkuligas … Per la rapideco de ĝia (t.e. de la mono) moviĝo ĝia kvanto estas kompletigata. Kiam necese, ĝi glitas nur de unu mano en la alian, sen ripozi eĉ nur momenton.” (Le Trosne, l.c., p. 915, 916.)

116„nek samtempe okazi”, laŭ la angla kaj franca versioj. -vl

ĉiuj bankistoj.

Kiel en la moncirkulado entute aperas nur la cirkuladprocezo de la varoj, do ilia rondiro tra kontraŭaj metamorfozoj, tiel en la rapideco de la moncirkulado la rapideco de ilia formŝanĝiĝo, la konstanta enplektiĝo de la metamorfozserioj, la hasto de la metabolo, la rapida malapero de la varoj el la cirkuladsfero kaj ilia same rapida anstataŭigo per novaj varoj. En la rapideco de la moncirkulado aperas do la flua unueco de la kontraŭaj kaj reciproke sin kompletigantaj fazoj, transformiĝo de la uzformo en valorformon kaj retransformiĝo de la valorformo en uzformon, aŭ de ambaŭ procezoj de vendo kaj aĉeto. Inverse, en la malrapidiĝo de la moncirkulado aperas la disiĝo kaj kontraŭa sendependiĝo de tiuj procezoj, la halto de la formŝanĝiĝo kaj pro tio de la metabolo. De kie tiu halto fontas, tio kompreneble ne videblas ĉe la cirkulado mem. Tiu montras nur la fenomenon mem. La populara opinio, kiu dum malrapidiĝinta moncirkulado vidas la monon malpli ofte aperi kaj malaperi ĉe ĉiuj punktoj de la cirkuladsfero, emas interpreti la fenomenon el mankhava kvanto de la cirkuladrimedoj.[117]

117 „Ĉar mono … prezentas la ĝeneralan mezuron por aĉeto kaj vendo, ĉiu, kiu havas ion por vendi, sed ne povas trovi aĉetanton, tuj emas pensi ke manko da mono en la reĝlando aŭ en la lando kulpas, se liaj varoj ne vendeblas; pro tio ĉie la kriado pri la manko da mono, kio tamen estas granda eraro … Kion bezonas tiuj homoj kiuj krias je mono? … La farmisto plendas … li pensas ke, se pli da mono estus en la lando, li povus ricevi prezon por siaj havaĵoj … Do ŝajne ne mankas al li mono, sed prezo por sia greno kaj sia brutaro kiun li deziras sed ne povas vendi … Kial li ne povas realigi prezon? … 1. Aŭ ekistas tro da greno kaj bruto en la lando, tiel ke al la plej multaj, kiuj alvenas ĉe la bazaro, same kiel al li malfacilas vendi, sed aĉeti nur al malmultaj, aŭ 2. la kutima vendo per eksporto haltas … aŭ 3. la konsumado malpliiĝas, kiam ekz-e la homoj sekve al malriĉeco ne elspezas same multe por sia mastrumado kiel antaŭe. Pro tio ne estas la pliiĝo de mono tutsimple kiu efikus favore al la havaĵoj de la farmisto, sed la forigo de tiuj tri kaŭzoj, kiuj vere tenas la merkaton malalta … Komercisto kaj butikisto bezonas same monon, t.e., ĉar la merkatoj haltas, mankas al ili vendado de la havaĵoj per kiuj ili komercas … Nacio neniam pli bone prosperas ol kiam la riĉaĵoj rapide iras de mano al mano.” (Sir Dudley North, „Discourses upon Trade”, Londono, 1691, p. 11-15.) Ĉiuj fantazioj de Herrenschwand venas al la konkludo ke la kontraŭdiroj fontantaj el la naturo de la varo kaj pro tio aperantaj en la varcirkulado forigeblas per pliigo de la cirkuladrimedoj. El la popola iluzio, kiu atribuas haltojn de la produktad- kaj cirkulad-procezo al manko de cirkuladrimedoj, sekvas cetere inverse, ke vera manko de cirkuladrimedoj, ekz-e sekve al oficialaj fuŝadoj per la „regulado de la moncirkulado” siavice ne povas kaŭzi haltojn.

La entuta kvanto da mono funkcianta en ĉiu tempospaco kiel cirkuladrimedo estas do determinata unuflanke per la prezsumo de la cirkulanta varmondo, aliflanke per la pli aŭ malpli rapida fluo de ĝiaj kontraŭaj cirkuladprocezoj, de kiu dependas, kiom da tiu prezsumo realigeblas per la samaj moneroj. Sed la prezsumo de la varoj dependas kaj de la kvanto kaj de la prezoj de ĉiu varspeco. Sed la tri faktoroj: la prezmoviĝo, la cirkulanta varkvanto kaj fine la cirkuladrapido de la mono, povas ŝanĝiĝi en diversa direkto kaj diversaj proporcioj, la realigenda prezsumo, pro tio la de ĝi kondiĉita kvanto da cirkuladrimendoj, povas do trairi tre multajn kombiniĝojn. Ni nombru ĉi tie nur la plej gravajn en la historio de la varprezoj.

Ĉe konstantaj varprezoj la kvanto da cirkuladrimedoj povas kreski, ĉar la kvanto da cirkulantaj varoj kreskas aŭ la cirkuladrapido de la mono malgrandiĝas aŭ ambaŭ efikas kune. La kvanto da cirkuladrimedoj povas inverse malgrandiĝi kun malgrandiĝanta varkvanto aŭ kreskanta cirkuladrapido.

Ĉe ĝenerale kreskantaj varprezoj la kvanto da cirkuladrimedoj povas resti sama, se la kvanto de la cirkulantaj varoj malkreskas en la sama proporcio laŭ kiu ĝia prezo kreskas, aŭ la cirkuladrapido de la mono samrapide kreskas kiel la prezaltiĝo, dum la cirkulanta varkvanto restas konstanta. La kvanto da cirkuladrimedoj povas fali, ĉar la varkvanto pli rapide malkreskas aŭ la cirkuladrapido pli rapide kreskas ol la prezoj.

Ĉe ĝenerale falantaj varprezoj la kvanto da cirkuladrimedoj povas resti sama, se la varkvanto kreskas en sama proporcio laŭ kiu ĝia prezo falas, aŭ la cirkuladrapido de la mono en la sama proporcio malkreskas kiom la prezoj. Ĝi povas kreski, se la varkvanto kreskas pli rapide aŭ la cirkuladrapido malkreskas pli rapide ol la varprezoj falas.

La variadoj de la diversaj faktoroj povas kompensi unu la alian, tiel ke spite al ilia konstanta fluktuado la realigenda tuta sumo de la varprezoj restas konstanta, do ankaŭ la cirkulanta monkvanto. Pro tio oni trovas, nome ĉe konsiderado de pli longaj periodoj, multe pli konstantan mezuman nivelon de la monkvanto cirkulanta en ĉiu lando ol oni atendus laŭ la impreso, escepte ĉe fortaj perturboj, kiuj fontas periode el la produktadaj kaj komercaj krizoj, malpli ofte el ŝanĝo en la monvaloro mem.

La leĝo, ke la kvanto de cirkuladrimedoj estas determinata per la prezsumo de la cirkulantaj varoj kaj la mezuma rapido de la moncirkulado[118],

118„Ekzistas certa mezuro kaj proporcio de la mono kiu necesas por vivteni la komercon de nacio; io pli aŭ io malpli ĝenus ĝin. Same kiel en malgranda

esprimeblas ankaŭ tiel, ke ĉe donita valorsumo de la varoj kaj donita mezuma rapideco de iliaj metamorfozoj, la kvanto de la cirkulanta mono aŭ de la monmaterialo dependas de sia propra valoro. La iluzio, ke inverse la varprezoj estas determinataj de la kvanto de la cirkuladrimedoj kaj tiuj siavice de la kvanto de en lando troviĝanta monmaterialo,[119] radikas ĉe siaj originaj reprezentantoj en la absurda hipotezo, ke varoj sen prezo kaj mono sen valoro eniras la cirkuladprocezon, kie tiam alikvota parto de la varkaĉo interŝanĝiĝas kun alikvota parto de la metalmonto.[120]

---

detalbutiko certa kvanto da kvaronpencoj necesas por ŝanĝi arĝentmonerojn kaj fari tiajn pagojn ne fareblajn per la plej malgrandaj arĝentmoneroj … Same kiel la kvanta proporcio de la en komerco necesaj kvaronpencoj dependas de la nombro da aĉetantoj, la ofteco de iliaj aĉetoj kaj antaŭ ĉio ankaŭ de la valoro de la plej malgranda arĝentmonero, tiel simile la proporcio de por nia komerco necesa mono (or- kaj arĝent-moneroj) estas determinata de la ofteco de la interŝanĝ-okazoj kaj de la alteco de la pagoj.” (William Petty, „A Treatise on Taxes and Contributions”, Londono, 1667, p. 17.) La teorio de Hume estis defendita kontraŭ J. Steuart k.a. de A. Young en lia „Political Arithmetic”, Londono 1774, kie aparta ĉapitro: „Prices depend on quantity of money” <”Prezoj dependas de la monkvanto”>, p. 112 sj. Mi rimarkigas en „Zur Kritik etc. [Kontribuaĵo al la kritiko ktp]”, p. 149 <Vd MEW, vol. 13, p. 142/143>: „La demandon pri la kvanto de la cirkulantaj moneroj li (A. Smith) forigas silente, per tio ke li traktas la monon tute malĝuste kiel nuran varon.” Tio validas nur por tiuj tekstoj en kiuj li pritraktas la monon oficiale. Sed okaze, ekz-e en la kritiko de la antaŭaj sistemoj de la politika ekonomio, li eldiras la ĝuston: „La kvanto de la stampita mono estas en ĉiu lando reguligata per la valoro de la varoj, kies cirkuladon ĝi devas peri … La valoro de la en lando jare aĉetataj kaj vendataj varoj postulas certan kvanton da mono por cirkuligi kaj distribui ilin al iliaj veraj konsumantoj, sed ne povas krei uzeblecon por pli da mono. La kanalo de la cirkulado altiras nepre sumon, kiu sufiĉas por plenigi ĝin, sed neniam alprenas pli grandan.” („Wealth of Nations”, [vol. III], 1. IV, ĉ. I. [p. 87, 89.]) Simile A. Smith komencas sian oficialan verkon per apoteozo de la labordivido. Poste, en la lasta libro pri la fontoj de la ŝtatenspezo, li reproduktas okaze la denuncon de la labordivido de A. Ferguson, lia instruinto.

119 „La prezoj de la aĵoj certe kreskos en ĉiu lando tiom, kiom la kvantoj da oro kaj arĝento kreskas inter la homoj; sekve, kiam en iu lando oro kaj arĝento malpliiĝas, ankaŭ la prezoj de ĉiuj varoj devas malkreski proporcie al tiu malpliiĝo de la mono.” (Jacob Vanderlint, „Money answers all Things”, London 1734, p. 5) Pli detala komparo inter Vanderlint kaj la „Essays” de Hume ne lasas al mi eĉ la plej etan dubon, ke Hume konis kaj uzis la cetere gravan verkon de V. La opinio, ke la kvanto da cirkuladrimedoj determinas la prezojn, troviĝas ankaŭ ĉe Barbon kaj ankoraŭ pli malnovaj verkistoj. „Nenia

## c) La monero. La valorsigno

La monera formo de la mono fontas el ties funkcio kiel cirkuladrimedo. La pezkvanto de oro prezentata en la prezo aŭ monnomo de la varoj devas alpaŝi ilin en la cirkulado kiel samnoma orpeco aŭ monero. Kiel la difino de la skalo de la prezoj, la stampado de moneroj estas tasko de la ŝtato. En la diversaj naciaj uniformoj, kiujn oro kaj arĝentoj portas sed en la mond-

---

maloportunaĵo, diras Vanderlint, povas estiĝi pro senbara komerco, sed nur tre granda utilo, ĉar se la kvanto da kontanta mono de la nacio estas malpliigita de ĝi, kion la prohibiciaj disponoj ja devas malebligi, tiam la nacioj, al kiuj la kontanta mono alfluas, certe konstatos, ke ĉiaj aĵoj preze kreskas en la sama proporcio en kiu la kvanto da kontanta mono ĉe ili kreskas. Kaj … niaj manufakturproduktoj kaj ĉiuj aliaj varoj fariĝos baldaŭ tiom malmultekostaj, ke la komerca bilanco turniĝos ree al nia favoro, kaj sekve de tio la mono refluos al ni.” (l. c., p. 43,44.)

120 Ke ĉiu unuopa varspeco per sia prezo fariĝas elemento de la prezsumo de ĉiuj cirkulantaj varoj, estas memkomprenebla. Sed kiel nekomunmezuraj uzvaloroj interŝanĝiĝu amase kun la or- kaj arĝento-amaso troviĝanta en la lando, estas tute nekomprenebla. Se oni fantazias la varmondon en unu solan ĉiomvaron, de kiu ĉiu varo estas nur alikvota parto, tiam elvenas la bela kalkulekzemplo: ĉiomvaro = x kg da oro. Varo A = alikvota parto de la ĉiomvaro = la sama alikvota parto de x kg da oro. [Originale, Markso uzas la pezmezuron „Ztr.” (germ. Zentner = 100 funtoj = 50 kg). -vl] Jen tio sincere ĉe Montesquieu: „Se oni komparas la kvanton da oro kaj arĝento ekzistanta en la mondo kun la sumo de la ekzistantaj varoj, tiam oni povas certe kompari ĉiun unuopan produkton resp. varon kun certa kvanto de la mono. Ni supozu ke ekzistas nur unu sola produkto resp. unu sola varo, aŭ ke nur unu estu aĉetata kaj ke ĝi estas same dividebla kiel la mono: certa parto de tiu varo respondus tiam al parto de la monkvanto; la duono de la tutaĵo de la varoj al la duono de la tuta monkvanto, ktp. … la determinado de la varprezoj dependas envere ĉiam de la proporcio de la ĉioma kvanto de la varoj al la ĉioma kvanto de la monsignoj.” (Montesquieu, l. c., vol. III, p. 12, 13.) Pri la pluevoluado de tiu teorio de Ricardo, fare de lia disĉiplo James Mill, Lord Overstone ktp, kp „Zur Kritik etc.”, p. 140-146, kaj p. 150 sj. <Vd vol 13, p. 124-140 kaj p. 143 sj.> S-ro J. St. Mill kapablas, per eklektika logiko kiun li bone konas, kongrui kun la opinio de sia patro J. Mill kaj samtempe kontraŭi ĝin. Se kompari la tekston de lia kompendio „Princ. of Pol. Econ.”, kun la antaŭparolo (una eldono), en kiu li anoncas sin mem kiel la Adam Smith de la nuntempo, tiam oni ne scias kion pli admiri, la naivecon de tiu homo aŭ tiun de la publiko kiu plenfide akceptis lin kiel Adam Smith, al kiu li rilatas proksimume kiel la generalo Williams Kars de Kars al la duko de Wellington. La nek ampleksajn nek

merkato demetas, aperas la distingo inter la internaj aŭ naciaj sferoj de la varcirkulado kaj ilia ĝenerala mondmerkata sfero.

Ormonero kaj ingota oro distingiĝas dekomence nur per la figuro, kaj oro estas konstante transformebla el unu formo al alia.[121] Sed la vojo el la stampejo estas samtempe la iro al la fandejo. Ĉar dum la cirkulado la ormoneroj eluziĝas, unu pli, la alia malpli. Ortitolo kaj orsubstanco, nominala enhavo kaj reala enhavo komencas sian distingoprocezon. Samnomaj ormoneroj fariĝas malsamvaloraj, ĉar malsampezaj. La oro kiel cirkuladrimedo devias de oro kiel mezurilo de prezoj kaj per tio ankaŭ ĉesas esti reala ekvivalento de la varoj kies prezojn ĝi realigas. La historio de tiuj konfuziĝoj estas la stamphistorio de la mezepoko kaj de la moderna epoko ĝis en la 18-a jarcento. La natureca tendenco de la cirkuladprocezo transformi la oreston de la monero en orŝajnon aŭ la moneron en simbolon de ĝia oficiala metalenteno, estas eĉ rekonata de la plej modernaj leĝoj pri la grado de metalperdo kiu igas orpecon nekurziva[122] aŭ malmonigas ĝin.

Se la moncirkulado mem distingas la realan enhavon disde la nominala enhavo de la monero, ĝian metal-eston disde ĝia funkcia esto, tiam ĝi ricevas la latentan eblecon anstataŭigi la metalmonon en ĝia monera funkcio per markoj el alia materialo aŭ simboloj. La teĥnikaj obstakloj de

enhavriĉajn original-esploraĵojn de s-ro J. St. Mill en la kampo de la pol. ekon. oni trovas ĉiujn laŭvice paradantajn en lia 1844 aperinta verketo: „Some Unsettled Questions of Political Economy”. Locke eldiras rekte la interrilaton de senvaloreco de oro kaj arĝento kaj la determinado de ilia valoro per kvanto. „Ĉar la homoj interkonsentis doni al oro kaj arĝento imagan valoron … la interna valoro, kiun oni vidas en tiuj metaloj, estas nenio alia ol ilia kvanto.” („Some Considerations etc.”, 1691, [en] „Works”, eld. 1777, vol., II, p. 15.)

121 Estas kompreneble tute trans mia celo pritrakti detalojn kiel stamprajto k.s. Tamen [mi citu] kontraŭ la romantika jesulaĉo Adam Müller, kiu admiras „la grandiozan liberalecon” per kiu la „angla registaro stampas senpage”, jenan juĝon de Sir Dudley North: „Arĝento kaj oro havas kiel aliaj varoj siajn tajdojn. Kiam alvenas kargo el Hispanio, … ĝi estas transportata en la Tower kaj stampata. Nelonge post tio estiĝas postulo por ingotoj por eksporto. Se ekzistas neniuj, sed hazarde ĉio estas stampita, kion fari? Oni refandos ĝin; tio ne signifas perdon, ĉar la stampado kostas neniom al la posedanto. Sed la nacio havas la malutilon, ĉar ĝi pagas por tio, ke pajlo, per kiu oni nutras azenojn, estas antaŭe plektita. Se la komercisto (North estis mem unu el la plej grandaj komercistoj tempe de Charles II) devus pagi prezon por la stampado, tiam li ne senpripense sendus sian arĝenton en la Tower, kaj stampita mono havus tiam ĉiam pli altan valoron ol nestampita arĝento.” (North, l.c., p. 18.)

122 Nekapabla roli kurze. -vl

stampado de tute etaj pezpartoj de oro respektive arĝento kaj la cirkonstanco ke malpli noblaj metaloj servis komence anstataŭ la pli noblaj, arĝento anstataŭ oro, kupro anstataŭ arĝento, kiel valorskalo kaj pro tio cirkulas kiel mono en la momento dum kiu la pli nobla metalo detronigas ilin, klarigas historie la rolon de arĝent- kaj kupro-markoj kiel substituaĵoj de ormonero. Ili anstataŭas la oron en tiuj rondoj de la varcirkulado, kie la monero plej rapide cirkulas kaj pro tio plej rapide eluziĝas, do kie aĉetoj kaj vendoj senĉese renoviĝas en plej eta skalo. Por malebligi la enradikiĝon de tiuj satelitoj anstataŭ la oro mem, oni leĝe determinas la tre malaltajn proporciojn laŭ kiuj sole ili akceptendas anstataŭ oro kiel pago. La apartaj rondoj en kiuj cirkulas la diversaj specoj de moneroj, kompreneble interplektiĝas. La etvalora monero aperas apud la oro por pagi onojn de la plej eta ormonero; la oro eniras konstante en la detalcirkuladon, sed estas same konstante, pro interŝanĝo kun etvalora monero, elĵetata.[123]

La metalenhavo de la arĝentaj kaj kupraj markoj estas arbitre difinita per la leĝo. Cirkulante ili eluziĝas ankoraŭ pli rapide ol ormonero. Ilia moner-funkcio fariĝas do fakte tute sendependa de ilia pezo, t.e. de ĉia valoro. La moner-esto de oro distingiĝas tute de sia valorsubstanco. Relative senvaloraj aĵoj, paperpecoj, povas do funkcii anstataŭ ĝi kiel monero. En la metalaj monmarkoj la pura simboleco estas ankoraŭ sufiĉe kaŝita. En la papermono ĝi evidentiĝas. Oni vidas: Gravas nur la unua paŝo[124].

Temas ĉi tie nur pri ŝtata papermono kun deviga kurzo. Ĝi elkreskas rekte el la metala cirkulado. Kreditmono, male, premisas kondiĉojn kiuj, el la vidpunkto de la simpla varcirkulado, estas al ni ankoraŭ tute nekonataj. Sed preterpase estu dirite ke, kiel vera papermono fontas el la funkcio de mono kiel cirkuladrimedo, la kreditmono, en la funkcio de mono

123„Se neniam ekzistas pli da arĝentmono ol necesa por la pli malgrandaj pagoj, ĝi ne akumuleblas en sufiĉaj kvantoj por pli grandaj pagoj … La uzado de oro por grandaj pagoj inkludas necese ankaŭ ĝian uzadon en la detalkomerco: Kiu havas ormonerojn, uzas ilin ankaŭ ĉe pli malgrandaj aĉetoj kaj returne ricevas kun la aĉetita varo la reston en arĝento; per tio la tropluso da arĝento, kiu alie ĝenus la detalkomerciston, estas deprenata de li kaj alkondukata al la ĝenerala cirkulado. Sed se ekzistas tiom da arĝento, ke la etaj pagoj fareblas sendepende de oro, tiam la detalkomercisto ricevos por etaj aĉetoj arĝenton, kiu tiam nepre amasiĝos ĉe li.” (David Buchanan, „Inquiry into the Taxation and Commercial Policy of Great Britain”, Edinburgo 1844, p. 248, 249.)

124*En la originalo france:* „ Ce n'est que le premier pas qui coûte”. -vl

kiel pagrimedo, posedas sian spontecan[125] radikon.[126]

Paperpecoj, sur kiuj estas presitaj monnomoj, kiel 1 Sterlinga Pundo, 5 Sterlingaj Pundoj ktp, estas de la ŝtato de ekstere enĵetitaj en la cirkulad-procezon. En la mezuro laŭ kiu ili cirkulas vere anstataŭ la samnoma orsumo, ilia moviĝo spegulas nur la leĝojn de la moncirkulado mem. Specifa leĝo de papercirkulado povas fonti nur el ilia reprezentiĝ-proporcio al oro. Kaj tiu leĝo estas simple tiu, ke la eldono de papermono estas limigenda al la kvanto en kiu la de ĝi simbole prezentata oro (resp. arĝento) devus vere cirkuli. Sed la orkvanto, kiun la cirkuladsfero povas sorbi, ja fluktuas konstante super aŭ sub certa mezuma nivelo. Sed la kvanto de la cirkulanta perilo malkreskas en donita lando neniam sub certan minimumon kiu konstateblas laŭsperte. La fakto ke tiu minimuma kvanto ŝanĝas konstante siajn konsistaĵojn, t.e. konsistas ĉiam el aliaj orpecoj, kompreneble neniom ŝanĝas ĝian amplekson kaj ĝian konstantan vagadon en la cirkuladsfero. Ĝi estas do anstataŭigebla per papersimboloj. Se, male, hodiaŭ ĉiuj cirkuladkanaloj estas en plena grado de sia monsorba kapablo plenigitaj per papermono, tiam ili povas, sekve de fluktuadoj de la varcirkulado, morgaŭ esti superplenaj. Ĉia mezuro perdiĝas. Sed se la papero transpaŝas sian mezuron, t.e. la kvanton de ormoneroj de sama nomo kiu povus cirkuli, tiam ĝi prezentas, sendepende de la danĝero de ĝenerala diskreditiĝo, ene de la varmondo tamen nur la orkvanton determinitan de ĝiaj imanentaj leĝoj, do ankaŭ sole reprezenteblan orkvanton. Se la kvanto da paperslipoj ekz-e prezentas po 2 uncojn da oro

125 *En la originalo:* „… sian naturecan radikon.” -vl

126 La financa mandareno Wan-mao-in, la ĉina impostĉefo, iun tagon havis la ideon proponi al la Filo de la Ĉielo projekton kiu kaŝe celis transformi la ĉinajn imperiajn asignatojn [do, papermonon, -vl] en interŝanĝeblajn bankbiletojn. En la raporto de la asignat-komitato de aprilo 1854 li estas sufiĉe draŝata. Ĉu li ankaŭ ricevis la nepran draŝadon per bambuo, pri tio la raporto ne informas. „La Komitato, tiel fine de la raporto, atente konsideris lian projekton kaj opinias ke ĉio en ĝi kondukas al avantaĝo de la komercistoj kaj ke nenio estas avantaĝa por la krono.” („Arbeiten der Kaiserlich Russischen Gesandtschaft zu Peking über China [Laboraĵoj de la Imperiestra Rusa Ambasadejo en Pekino pri Ĉinio]”. El la rusa de D-ro K. Abel kaj F. A. Mecklenburg. Unua volumo, Berlino, 1858, p. 54) Pri la konstanta senmetaliĝo de la ormoneroj pro ilia cirkulado, iu „Governor” de la Banko de Anglio diras kiel atestanto antaŭ la „House of Lord's Committee” (pri „bank-acts”): „Ĉiujare freŝa klaso de soverenoj (la sovereign estas nomo de la sterlinga pundo) fariĝas tro malpeza. La klaso kiu unu jaron pasigas la ekzamenadon kiel plenpeza, perdas per eluziĝo sufiĉe por sekvajare movi la pesilon kontraŭ si.” (House of Lords' Committee, 1848, n-ro 429)

anstataŭ po 1 uncon, tiam fakte 1 sterlinga pundo fariĝas la monnomo de, ni diru, proksimume $^1/_8$ unco anstataŭ de $^1/_4$ unco. La efiko estas la sama, kvazaŭ la oro en sia funkcio de prezmezuro estus ŝanĝita. La samaj valoroj, kiuj antaŭe esprimiĝis en la prezo de 1 sterlinga pundo, esprimas sin nun en la prezo de 2 sterlingaj pundoj.

La papermono estas orsigno aŭ monsigno. Ĝia rilato al la varvaloroj ekzistas nur en tio ke ili estas idee esprimataj en la samaj orkvantoj kiuj estas de la papero simbole prezentataj. Nur en tio ke la papermono reprezentas orkvantojn, kiuj, kiel ĉiuj aliaj varkvantoj, estas ankaŭ valorkvantoj, ĝi estas valorsigno.[127]

Fine estas la demando, kial la oro anstataŭigeblas per nuraj senvaloraj signoj de si mem. Sed ĝi estas, kiel ni vidis, nur tiom anstataŭigebla, kiom en sia funkcio kiel monero aŭ cirkuladrimedo ĝi estas izolita aŭ sendependigita. Nu, la sendependiĝo de tiu funkcio ja ne okazas por la unuopaj ormoneroj, kvankam ĝi aperas en la daŭra cirkulado de eluzitaj moneroj. La ormoneroj estas nuraj moneroj aŭ cirkuladrimedoj ĝuste nur tiom longe kiom ili vere troviĝas en la cirkulado. Sed kio ne validas por la unuopa ormonero, validas por la minimuma kvanto da oro anstataŭigebla per papermono. Ĝi vagadas konstante en la cirkuladsfero, funkcias konstante kiel cirkuladrimedo kaj ekzistas pro tio ekskluzive kiel portanto de tiu funkcio. Ĝia moviĝo prezentas do nur la konstantan reciprokan formŝanĝon de la kontraŭaj procezoj de la varmetamorfozo vr – m – vr, en kiu la varon alpaŝas ĝia valorformo nur por tuj malaperi. La memstara prezentado de la interŝanĝvaloro de la varo estas ĉi tie nur efemera momento. Tuj ĝi estas anstataŭigita per alia varo. Pro tio sufiĉas ankaŭ la nure simbola ekzisto de la mono en procezo kiu malaperigas ĝin konstante el unu mano en la alian. Ĝia funkcia ekzisto sorbas por tiel diri ĝian materian. Kiel malaperanta objektivigita reflekto de la varprezoj ĝi funkcias

127 *Noto al la 2-a eldono:* Kiel malklare eĉ la plej bonaj verkistoj pri monaferoj komprenas la diversajn funkciojn de la mono, montras ekz-e la sekva tekstero el Fullarton: „Koncerne nian enlandan interŝanĝon, ĉiuj monfunkcioj, kiuj estas kutime plenumataj de or- aŭ arĝent-moneroj, plenumeblas samefike de cirkulado de neendoseblaj notoj, kiuj havas nenion alian valoron ol tiun artefaritan kaj interkonsentitan valoron, kiun ili ricevis per leĝo – fakto kiu, mi pensas, ne refuteblas. Tia valoro utiligeblus por ĉiuj celoj de interna valoro kaj povus eĉ superfluigi la neceson de valormezurilo, se nur la kvanto de ĝiaj eldonoj estas tenata en la taŭgaj limoj.” (Fullarton, „Regulation of Currencies”, 2-a eld., Londono 1845, p. 21.) Do, ĉar la monvaro estas anstataŭigebla per nuraj valorsignoj en la cirkulado, ĝi estas superflua kiel mezuro de la valoroj kaj mezurilo de la prezoj!

jam nur kiel signo de si mem kaj pro tio ankaŭ povas esti anstataŭigata per signoj.[128] Sed la monsigno bezonas sian propran objektive socian validecon, kaj tiun la papersimbolo ricevas per la deviga kurzo. Tiu ŝtata devigo validas nur ene de la cirkuladsfero priskribita de la limoj de komunumo, aŭ la interna cirkuladsfero, sed ankaŭ ĉi tie la mono dissolviĝas komplete en sian funkcion kiel cirkuladrimedo aŭ metalmono kaj pro tio povas ricevi en la papermono nure funkcian ekzistmanieron ekstere disigitan de ĝia metalsubstanco.

## 3. Mono

La varo, kiu funkcias kiel valormezuro kaj pro tio ankaŭ, korpe aŭ per reprezentantoj, kiel cirkuladrimedo, estas mono. Oro (resp. arĝento) estas do mono. Ĝi funkcias kiel mono, unuflanke, kie ĝi devas aperi en sia ora (resp. arĝenta) korpeco, do kiel monvaro, do nek nur idee, kiel en la valormezuro, nek reprezentkapabla, kiel en cirkuladrimedo; aliflanke,ĝi funkcias ankaŭ kiel mono, kie ĝia funkcio, egale ĉu ĝi plenumas tiun en propra persono aŭ per reprezentantoj, fiksas ĝin kiel solan valorformon aŭ sole adekvatan ekzistadon de la interŝanĝvaloro fronte al la aliaj varoj kiel nuraj uzvaloroj.

### *a) Trezorigo*

La konstanta rondirado de la du kontraŭaj varmetamorfozoj aŭ la senĉesa alternado de vendo kaj aĉeto aperas en la senlaca cirkulado de la mono aŭ en ĝia funkcio kiel *perpetuum mobile* de la cirkulado. Ĝi haltas, aŭ transformiĝas, kiel diras Boisguillebert, el moveblaĵo en nemoveblaĵ-

128 El tio, ke oro kaj arĝento kiel monero aŭ en la ekskluziva funkcio kiel cirkuladrimedo fariĝas signoj de si mem, Nicholas Barbon deduktas la rajton de la registaroj „to raise money” <„altigi la monvaloron”>, t.e. doni ekz-e al kvankto da arĝento, kiu nomiĝis groŝo, la nomon de pli granda arĝentokvanto, kiel talero, kaj tiel repagi al la kreditoroj groŝojn anstataŭ talerojn. „Mono eluziĝas kaj fariĝas pli malpeza pro multa elnombrado … Estas la nomado kaj la kurzo de la mono, kion la homoj atentas en la komerco, kaj ne la kvanto da arĝento … Estas la ŝtata aŭtoritato, kiu faras la metalon mono.” (N. Barbon, l.c., p. 29, 30, 25.)

on[129], el cirkulanta mono en stagnantan monon[130], ekde kiam la vico de metamorfozoj estas interrompita, do kiam la vendo ne estas kompletigata per sekva aĉeto.

Kun la unua evoluo de la varcirkulado mem evoluas la neceso kaj la pasia deziro firme teni la produkton de la unua metamorfozo, la transformitan formon de la varo aŭ ĝian orpupon.[131] Varo estas vendata, ne por aĉeti varon, sed por anstataŭigi varformon per monformo. El nura perado de la metabolo tiu formŝanĝo fariĝas memstara celo. La fremdigita formo[132] de la varo estas malhelpata funkcii kiel ĝia absolute fremdigebla[133] aŭ nur malaperanta monformo. Per tio la mono ŝtoniĝas al trezoro, kaj la varvendisto fariĝas trezorigisto.

Ĝuste en la komencoj de la varcirkulado nur la kromaĵo de uzvaloroj transformiĝas en monon. Oro kaj arĝento tiel fariĝas mem sociaj esprimoj de superfluo aŭ de riĉeco. Tiu naiva formo de trezorigo eterniĝas ĉe popoloj ĉe kiuj la tradicia produktadmaniero estas orientita al kontentigo de firme ŝlosita rondo de limigitaj bezonoj. Tiel ĉe la azianoj, nome ĉe la hindoj. Vanderlint, kiu opinias ke la varprezoj estas determinataj de la kvanto da en lando troviĝanta oro kaj arĝento, demandas sin, kial la hinda varo estas tiom malmultekosta. Respondo: Ĉar la hindoj enfosas la monon. De 1602 ĝis 1734, rimarkigas li, ili enfosis 150 milionojn da sterlingaj pundoj en arĝento, kiuj origine venis el Ameriko al Eŭropo.[134] De 1856 ĝis 1866, do en 10 jaroj, Anglio eksportis al Hindio kaj Ĉinio (la metalo eksportita al Ĉinio refluas grandparte al Hindio) 120 milionojn da sterlingaj pundoj en arĝento, kiu estis antaŭe interŝanĝita kontraŭ aŭstralia oro.

Kun pli evoluinta varproduktado ĉiu varproduktisto devas certigi al si

129 *Originale en la franca:* meuble resp. immeuble. -vl

130 O*riginale:* aus Münze in Geld: „el metalmonero en monon" – terminoj hodiaŭ jam ne evidentaj. -vl

131 „Riĉaĵo je mono estas nenio alia ol … riĉaĵo je produktaĵoj kiuj estas transformitaj en monon." (Mercier de la Rivière, l.c., p. 573.) „Valoro en formo de produktaĵoj nur ŝanĝis la formon." (saml., p. 486.)

132 *Originale:* „entäußerte Gestalt" – hegela esprimo por „fordonita formo", aŭ „senigita formo", en la angla: „*alienated*". -vl

133 *Originale:* „veräußerliche Gestalt" – hegela esprimo por „fordonebla", „forigebla", „senigebla" formo, en la angla versio: „alienable". -vl

134 „Per tiuj disponoj ili tenas ĉiujn siajn havaĵojn kaj fabrikaĵojn tiom malaltaj en la prezo." (Vanderlint, l.c., p. 95, 96.)

la *nervus rerum*[135], la „socian garantiaĵon".[136] Liaj bezonoj renoviĝas senĉese kaj ordonas senĉesan aĉetadon de fremda varo, dum produktado kaj vendado de lia propra varo kostas tempon kaj dependas de hazardoj. Por aĉeti sen vendi li devas antaŭe esti vendinta sen aĉeti. Tiu operacio, plenumata ĝeneralskale, ŝajnas kontraŭdiri sin mem. Sed la noblaj metaloj interŝanĝiĝas ĉe iliaj produktfontoj rekte kun aliaj varoj. Ĉi tie okazas vendo (flanke de la varposedanto) sen aĉeto (flanke de la or- kaj arĝent-posedanto).[137] Kaj postaj vendoj sen sekvantaj aĉetoj peras nur la pluan dispartigon de la noblaj metaloj inter ĉiuj varposedantoj. Tiel estiĝas sur ĉiuj punktoj de la trafiko or- kaj arĝent-trezoroj de plej diversa amplekso. Kun la ebleco firme teni la varon kiel interŝanĝvaloron aŭ la interŝanĝvaloron kiel varon, vekiĝas la or-avido. Kun la etendiĝo de la varcirkulado kreskas la potenco de la mono, de la ĉiam frappreta, absolute socia formo de riĉaĵo.

> *„Oro estas mirindaĵo! Kiu posedas ĝin, estas mastro de ĉio kion li deziras. Per oro oni povas eĉ venigi animojn en la paradizon."* (Kolumbo, en letero el Jamajko, 1503.)

Ĉar ne eblas vidi ĉe la mono kio estas en ĝin transformita, ĉio transformiĝas, ĉu varo aŭ ne, en monon. Ĉio fariĝas vendebla kaj aĉetebla. La cirkulado fariĝas la granda socia retorto, en kiun ĉio enflugas, por poste elveni kiel monkristalo. Al tiu alĥemio rezistas eĉ ne ostoj de sanktuloj kaj ankoraŭ multe malpli la malpli krudaj *sanktaĵoj ekster la komerco de la homoj*.[138]Kiel en la mono ĉia kvalita diferenco de la varoj estas estingita, ĝi siavice kiel radikala egaligisto estingas ĉiajn diferencojn.[139]

---

135 Latina esprimo, „nervo de la aferoj". -vl

136 „Mono estas garantiaĵo." (John Bellers, „Essay about the Poor, Manufactures, Trade, Plantations, and Immorality", Londono, 1699, p. 13.

137 Aĉeto en kategoria senco nome supozigas oron aŭ arĝenton kiel jam transformitan formon de la varo aŭ kiel produkton de vendo.

138 [*Originale en la latina:* „res sacrosanctae, extra commercium hominum". -vl]

Henriko la 3-a, plej kristana reĝo de Francio, prirabas monaĥejojn ktp, iliajn relikvojn, por vendi ilin. Oni scias, kiun rolon ludas la rabo de la delfiaj templotrezoroj fare de la focidanoj en la greka historio. Kiel konate, ĉe la antikvuloj, la temploj servis kiel loĝejo al la dio de la varoj. Ili estis „sanktaj bankoj". Al la fenicoj, tipa komercpopolo, la mono estis konsiderata kiel la fordonita formo de ĉiuj aĵoj. Pro tio estis en la ordo, ke la virgulinoj, kiuj dum la festoj de la amdiino fordonis sin al la fremduloj, oferis al la diino la monon ricevitan kiel kompensaĵon.

139 „Oro! altvalora, trembrila, ruĝa oro!
Tiom da ĝi, blankigas nigron, igas nigron blanka, malbelon bela;

Sed mono estas mem varo, ekstera aĵo, kiu povas fariĝi privata proprieto de ĉiu ajn. La socia povo fariĝas tiel privata povo de la privata persono. La antikva socio denuncis monon pro tio kiel la subfosan aganton de la ekonomia kaj morala ordo.[140] La moderna socio, kiu jam en siaj infanaj jaroj eltiras ĉe la haroj Plutonon el la intestoj de la tero[141], salutas en la orparadizo la brilan enkarniĝon de sia propra vivprincipo.

La varo kiel uzvaloro kontentigas apartan bezonon kaj konsistigas apartan elementon de la materia riĉaĵo. Sed la valoro de la varo mezuras la gradon de ĝia altirpovo sur ĉiuj elementoj de la materia riĉaĵo, pro tio la socian riĉon de ĝia posedanto. Al la barbare simpla varposedanto, eĉ al okcidenteŭropa kampulo, la valoro estas nedisigebla de la valorformo, pliigo de la or- kaj arĝent-trezoro do valorpliigo. Tamen la valoro de la mono ŝanĝiĝas, ĉu sekve al sia propra valorŝanĝiĝo, ĉu al valorŝanĝiĝo de la varoj. Sed tio unuflanke ne malebligas ke 200 uncoj da oro entenas poste kiel antaŭe pli da valoro ol 100, 300 pli ol 200 ktp, nek aliflanke ke la metala naturformo de tiu aĵo restas la ĝenerala ekvivalentformo de ĉiuj varoj, la senpere socia enkarniĝo de ĉia homa laboro. La instinkto de trezorigo estas de naturo senlima. Kvante aŭ laŭ sia formo la mono estas senlima, t.e. ĝenerala reprezentanto de la materia riĉaĵo, ĉar rekte trans-

---

Malbonon bona, maljunon juna, malkuraĝon kuraĝa, malnoblon nobla.
… Ho dioj! kial tio? kial tio, dioj;
Ho! tio logas vian pastron for de la altaro;
Forŝiras al duonkuracito la dormkusenon;
Ja tiu ruĝa sklavo ligas kaj malligas
Sanktajn ligojn; benas la malbenitulon;
Ĝi igas lepron ĉarma; honoras la ŝteliston,
Kaj donas al li rangon, fleksitan genuon kaj influon
En la konsilion de la senatoroj; ĝi
kondukas svatantojn al kadukaĝa vidvino;
… Damnita metalo,
vulgara putino de la homoj.” (Ŝekspiro: „Timon of Athens”)

140 „Ĉar neniu tiom abomeninda malbono, kiel la valoro de la mono,
Elkreskis al la homo: tiu kapablas rompi eĉ la urbojn,
Tiu pelas virojn for el bien' kaj hejm';
Tiu instruas kaj inversigas la noblan senton
De honestaj viroj, praktiki fian agon,
Montras la vojojn de malica ruz' al mortidevuloj
Kaj instruas al ili ĉian faron kiun abomenas dioj.”
(Sofoklo: „Antigono)”

141 „La avaro esperas eltiri Plutonon mem el la interno de la tero.” (Ateneo: „Dejpnos”)

formebla en ĉian varon. Sed samtempe ĉiu reala monsumo estas kvante limigita, pro tio ankaŭ nur aĉetrimedo de limigita efikeco. Tiu kontraŭdiro inter la kvanta limo kaj la kvalita senlimeco de la mono pelas la trezorfariston ĉiam denove al la sizifa laboro de akumulado. Okazas al li kiel al la mondkonkeranto, kiu kun ĉiu nova lando konkeras nur novan limon.

Por reteni la oron kiel monon kaj do kiel elementon de trezorigo, oni devas malebligi ĝin cirkuli aŭ dissolviĝi kiel aĉetilo. La trezorfaristo oferas do al la orfetiĉo sian karnan ĝuon. Li serioze realigas la evangelion de sinofero. Aliflanke li povas eltiri el la cirkulado en formo de mono nur tion kion li donas al ĝi en formo de varo. Ju pli li produktas, des pli li povas vendi. Laboremo, ŝparemo kaj avareco konsistigas do liajn ĉefajn virtojn, multe vendi, malmulte aĉeti, la sumon de lia politika ekonomio.[142]

Apud la kruda formo de trezoro evoluas ĝia estetika formo, la posedo de or- kaj arĝent-varoj. Ĝi kreskas kun la riĉaĵo de la burĝa socio. „Ni estu riĉaj aŭ ŝajnu riĉaj" (Diderot)[143] Tiel estiĝas ĉiam pli ampleksa merkato por oro kaj arĝento, sendepende de iliaj monfunkcioj, parte latenta alflufonto de mono, kiu fluas ĉefe en sociaj ŝtormperiodoj.

La trezorigo plenumas diversajn funkciojn en la ekonomio de metala cirkulado. La sekva funkcio fontas el la cirkuladkondiĉoj de la or- aŭ arĝent-monero. Oni vidis, kiel kun la konstantaj fluktuadoj de la varcirkulado laŭ amplekso, prezoj kaj rapideco la cirkulanta kvanto de mono senlace flusas kaj malflusas. Ĝi devas do kapabli je kuntiriĝo kaj ekspansio. Jen mono altirendas en la cirkuladon, jen cirkulantaj moneroj devas esti malhelpataj funkcii kiel cirkulanta mono. Por ke la reale cirkulanta monkvanto ĉiam respondu al la satiĝgrado de la cirkulsfero, la or- kaj arĝent-kvanto troviĝanta en iu lando devas esti pli granda ol la kvanto en formo de cirkulanta mono. Tiu kondiĉo estas plenumata per la trezorformo de la mono. La trezorrezervoj servas samtempe kiel forkondukaj kaj alkondukaj kanaloj de la cirkulanta mono, kiu pro tio neniam tro plenigas siajn cirkuladkanalojn.[144]

---

142 „Kiom eble plej pliigi la nombron da vendistoj, kiom eble plej malpliigi la nombron da aĉetantoj, jen la ĉarniro laŭ kiu ĉiuj disponoj de la politika ekonomio turniĝas." (Verri, l.c., p. 53)

143 *En la originalo france: „Soyons riches ou paraissons riches."* -vl

144 „Por negoci, ĉiu nacio bezonas certan sumon da metalmono <specifick money>, kiu ŝanĝiĝas kaj kelkfoje pli grandas, kelkfoje pli malgrandas, tiel kiel la kondiĉoj postulas tion … Tiuj flusoj kaj malflusoj de la mono reguligas sin mem sen ajna helpo de politikistoj … La siteloj laboras alterne: kiam mono malabundas, oni monigas ingotojn; kiam ingotoj malabundas, oni

## *b) Pagrimedo*

En la ĝis nun rigardita senpera formo de varcirkulado la sama valorgrando ekzistis ĉiam duoble, varoj sur unu poluso, mono ĉe la kontraŭa poluso. Pro tio la varposedantoj kontaktiĝis nur kiel reprezentantoj de reciproke ekzistantaj ekvivalentoj. Sed kun la evoluo de la varcirkulado evoluas kondiĉoj, per kiuj la vendo de la varo[145] estas tempe disigita de la realigo de ĝia prezo. Sufiĉas ĉi tie aludi la plej simplajn de tiuj kondiĉoj. Unu varspeco bezonas pli longan, la alia pli mallongan tempon por sia produktiĝo. La produktado de diversaj varoj estas ligita kun diversaj sezonoj. Iu varo naskiĝas sur la bazaro, la alia devas vojaĝi al malproksima bazaro. La unua varvendisto povas do aperi kiel vendisto, antaŭ ol la alia pretas kiel aĉetanto. Ĉe konstanta ripetado de la samaj transakcioj inter la samaj personoj la vendkondiĉoj de la varoj reguliĝas laŭ iliaj produktadkondiĉoj. Aliflanke la uzado de certaj varspecoj, ekz-e de domo, estas vendata por certa tempo. Nur post paso de tiu tempo la aĉetanto reale ricevas la uzvaloron de la varo. Li do aĉetas ĝin antaŭ ol pagi ĝin. La unua kiel varposedanto vendas ekzistantan varon, la alia aĉetas kiel nura reprezentanto de mono aŭ kiel reprezentanto de estonta mono. La vendisto fariĝas kreditoro, la aĉetanto ŝuldanto. Ĉar la metamorfozo de la varo aŭ la evoluo de ĝia valorformo ŝanĝiĝas ĉi tie, la mono ricevas ankaŭ alian funkcion. Ĝi fariĝas pagrimedo.[146]

---

fandas monerojn." (Sir D. North, l.c. [Postscript,] p. 3) John Stuart Mill, dum longa tempo oficisto de la Orienthindia Kompanio, konfirmas ke en Hindio la arĝentjuveloj daŭre funkcias kiel rekta trezoro. La *„arĝentaj ornamaĵoj estas monstampataj, kiam ekzistas alta interezkvoto*; ili remigras, kiam la interezkvoto falas". (J. St. Mills Evidence [en] „Repts. on Bankacts", 1857, n. 2084, 2101) Laŭ parlamenta dokumento de 1864 pri or- kaj arĝent-importo kaj -eksporto en Hindio la importo de oro kaj arĝento superis 1863 la eksporton je 19.367.764 sterlingaj pundoj. En la lastaj 8 jaroj antaŭ 1864 la pluso de la importo super la eksporto de la noblaj metaloj estis 109.652.917 sterlingaj pundoj. Dum tiu ĉi jarcento, multe pli ol 200.000.000 sterlingaj pundoj estis stampitaj en Hindio.

145 *Laŭvorte:* „eksterigo de la varo". -vl

146 Lutero distingas inter mono kiel aĉetrimedo kaj pagrimedo. *„Vi faras al mi ĝemelon el la Schadewacht* [interezsimila kompensaĵo, en la kazo ke la ŝuldanto ne povas ĝustatempe repagi], *ke mi jen ne povas pagi kaj jen ne povas aĉeti."* (Martin Luther: „An die Pfaffherrn, wider den Wucher zu predigen" [Marteno Lutero: „Al la pastroj, por prediki kontraŭ la uzuro"], Vitenbergo 1540)

La karaktero de kreditoro aŭ ŝuldanto[147] fontas ĉi tie el la simpla varcirkulado. Ties formŝanĝiĝo premas al la vendisto kaj aĉetanto tiujn novajn stampojn. Unue ili estas do same efemeraj roloj ludataj alterne de la samaj cirkulad-agantoj kiel tiuj de vendanto kaj aĉetanto. Sed ilia kontraŭdiro aspektas nun dekomence malpli agrable kaj kapablas konsiderinde solidiĝi.[148] Sed la samaj karakteroj povas aperi ankaŭ sendepende de la varcirkulado. La klasbatalo de la antikva mondo ekz-e okazas precipe en la formo de batalo inter kreditoroj kaj ŝuldantoj kaj finiĝas en Romo per la pereo de la pleba ŝuldanto, kiu estas anstataŭigita per la sklavo. En la mezepoko la batalo finiĝas per la pereo de la feŭda ŝuldanto, kiu perdas sian politikan potencon kun sia ekonomia bazo. Tamen la monformo – kaj la rilato de kreditoro kaj ŝuldanto havas la formon de monrilato – spegulas ĉi tie nur la antagonismon de pli profunde kuŝantaj vivkondiĉoj.

Ni revenu al la sfero de la varcirkulado. La samtempa apero de la ekvivalentoj varo kaj mono sur la du polusoj de la vendoprocezo ĉesis. La mono funkcias nun unue kiel valormezuro en la prezdeterminado de la vendata varo. Ĝia kontrakte fiksita prezo mezuras la ŝuldon de la aĉetanto, t.e. la monsumon kiun li ŝuldas je difinita tempo. Ĝi funkcias due kiel idea aĉetilo. Kvankam ĝi ekzistas nur en la monpromeso de la aĉetanto, ĝi rezultigas la manŝanĝon de la varo. Nur je la pagodato la pagrimedo eniras reale la cirkuladon, t.e. transiras el la mano de la aĉetanto en tiun de la vendanto. La cirkuladrimedo transformiĝis en trezoron, ĉar la cirkuladprocezo interrompiĝis kun la unua fazo, aŭ la transformita formo de la varo estis eltirita el la cirkulado. La pagrimedo eniras la cirkuladon, sed nur post kiam la varo jam eliris el ĝi. La mono jam ne peras la procezon. Ĝi finas ĝin memstare, kiel absoluta esto de la interŝanĝvaloro aŭ ĝenerala varo. La vendinto transformis varon en monon, por kontentigi bezonon per la mono, la trezorfaranto, por konservi la varon en monformo, la ŝuldanta aĉetanto, por povi pagi. Se li ne pagas, okazas trudvendoj de lia havaĵo. La valorformo de la varo, mono, fariĝas do nun memstara celo de la vendo per socia neceso fontanta el la kondiĉoj de la cirkuladprocezo mem.[149]

---

147 Ŝuldanto, alia esprimo: debitoro. -vl

148 Pri la rilatoj inter ŝuldantoj kaj kreditoroj ĉe la anglaj komercistoj komence de la 18-a jarcento: „Inter la komercistoj regas ĉi tie en Anglujo tioma spirito de krueleco, kiom renkonteblas en nenia alia homa socio kaj en nenia alia lando de la mondo.” („An Essay on Credit and the Bankrupt Act”, Londono, 1707, p. 2)

149 *En la franca eldono sekvas jena paragrafo:* „Ni supozu ke la terkulturisto

La aĉetanto retransformas monon en varon, antaŭ ol li transformis varon en monon, aŭ plenumas la duan varmetamorfozon antaŭ la unua. La varo de la vendanto cirkulas, sed realigas sian prezon nur en privatjura titolo je mono. Ĝi transformiĝas en uzvaloron, antaŭ ol transformiĝi en monon. La plenumado de sia unua metamorfozo okazas nur poste.[150]

En ĉiu etapo de la cirkuladprocezo la pagendaj ŝuldoj reprezentas la prezsumon de la varoj kies vendo estigis ilin. La monkvanto necesa por realigo de tiu prezsumo dependas unue de la cirkuladrapido de la pagrimedoj. Ĝi estas kondiĉita de du cirkonstancoj: la interligiteco de la rilatoj de kreditoro kaj ŝuldanto, tiel ke A, kiu ricevas monon de sia ŝuldanto B, pagas ĝin plu al sia kreditoro C ktp – kaj la tempo inter la diversaj pagodatoj.

La kontinua ĉeno de pagoj aŭ de poste okazantaj unuaj metamorfozoj distingiĝas esence de la antaŭe rigardata interplektiĝo de metamorfozvicoj. En la cirkulado de la cirkuladrimedo la rilato inter vendantoj kaj aĉetantoj estas ne nur esprimata. La rilato mem estiĝas nur en kaj per la moncirkulado. La moviĝo de la pagrimedo, male, esprimas sociajn rilatojn jam longe antaŭe ekzistantajn.

aĉetas de la teksisto dudek metrojn da tolo por du sterlingaj pundoj, kiuj estas ankaŭ la prezo de kvarto da tritiko, kaj ke li pagas ilin monaton poste. La terkulturisto transformas sian tritikon en tolon antaŭ ol transformi ĝin en monon. Li plenumas do la lastan metamorfozon de sia varo antaŭ ol la unuan. Poste li vendas tritikon por du sterlingaj pundoj, kiujn li transdonas al la teksisto je la interkonsentita dato. La reala mono jam ne servas al li kiel perilo por anstataŭigi la tritikon per tolo. Tio estas jam farita. Por li la mono estas, male, la lasta vorto de la transakcio ĉar ĝi estas la absoluta formo de valoro kiun li devas liveri, la universala varo. La varo de la teksisto ja cirkulis kaj realigis sian prezon, sed nur pere de titolo de civila juro. Ĝi eniris en la konsumadon de aliuloj antaŭ ol esti transformita en monon. La unua metamorfozo de lia tolo restas do pendanta kaj plenumiĝas nur poste, ĉe la limdato por pago de la ŝuldo de la terkulturisto.” -vl

150 *Noto al la 2-a eld.*_ El la sekva citaĵo, pruntita el mia 1859 aperinta skribaĵo, oni vidas kial en la teksto mi ne konsideras kontraŭan formon: „Inverse en la procezo m – v la mono forigeblas kiel reala aĉetrimedo kaj la prezo de la varo tiel realigeblas antaŭ ol la uzvaloro de la mono estas realigata aŭ la varo transdonata. Tio okazas ekz-e en la ĉiutaga formo de antaŭpago. Aŭ en la formo en kiu la angla registaro aĉetas … la opion de la Ryots en Hindio. Sed tiel la mono efikas nur en la jam konata formo de aĉetrimedo … Kapitalo estas kompreneble ankaŭ antaŭpagata . Sed tiu vidpunkto ne troviĝas en la horizonto de la simpla cirkulado.” („Zur Kritik ktp”, p. 119, 120. <Vd MEW, vol. 13, p. 117>)

Samtempeco kaj apudeco de la vendoj limigas la anstataŭigon de la monkvanto per cirkuladrapido. Ili konsistigas, inverse, novan levilon en la ekonomio de la pagrimedoj. Per la koncentriĝo de la pagoj en unu sama loko, specialaj institucioj kaj metodoj de ilia ekvilibrigo disvolviĝas naturece. Tiel ekz-e la transkontigoj[151] en la mezepoka Liono. La monpostuloj de A al B, B al C, C al A ktp bezonas nur esti konfrontitaj por kompensiĝi reciproke ĝis certa sumo kiel pozitivaj kaj negativaj grandoj. Tiel restas nur saldi ŝuldbilancon. Ju pli amase okazas la pagoj, des pli malgranda estas relative la bilanco, do la kvanto de la cirkulantaj pagrimedoj.

La funkcio de la mono kiel pagrimedo inkludas rektan kontraŭdiron. En la grado laŭ kiu la pagoj kompensiĝas, ĝi funkcias nur idee kiel kalkulmono aŭ mezuro de la valoroj. En la grado en kiu fariĝas reala pagado, ĝi ne aperas kiel cirkuladrimedo, kiel nur malaperanta kaj peranta formo de la metabolo, sed kiel la individua enkarniĝo de la socia laboro, memstara esto de la interŝanĝvaloro, absoluta varo. Tiu kontraŭdiro eksplodas en la momento de la produktadaj kaj komercaj krizoj, kiu nomiĝas monkrizo.[152] Ĝi okazas nur kie la etendiĝanta ĉeno de pagoj kaj artefarita sistemo de ĝia kompensado estas komplete disvolvitaj. Ĉe pli ĝeneralaj perturboj de tiu meĥanismo, egale de kie ili fontas, la mono tute subite kaj abrupte ŝanĝiĝas el la nur idea formo de kalkulmono en malmolan kontantan monon. Ĝi fariĝas neanstataŭigebla per profanaj varoj. La uzvaloro de la varoj fariĝas senvalora, kaj ilia valoro malaperas antaŭ la valorformo de la uzvaloro. La burĝo ankoraŭ ĵus deklaris en prosper-ebria arogo ke la mono estas vana iluzio. Nur la varo estas mono, kriis li. Nur la mono estas varo! Tiel sonas nun la krioj ĉie en la monda merkato. Kiel la cervo sopiregas freŝan akvon, tiel lia animo sopiregas monon, la solan riĉaĵon.[153]

151 *Originale:* „Virements". -vl

152 La monkrizo, kiel en la teksto difinita kiel aparta fazo de ĉiu ĝenerala produktada kaj komerca krizo, ja distingendas disde la specifa speco de la krizo, kiun oni nomas ankaŭ monkrizo, sed kiu povas aperi memstare, tiel ke ĝi nur reefikas al industrio kaj komerco. Tio estas krizoj kies movcentro estas la mon-kapitalo, kaj pro tio banko, borso, financo estis ĝia rekta sfero. (Noto de Markso al la 3-a eld.)

153 „Tiu subita ŝanĝo el la kreditsistemo en la monsistemon aldonas la teorian hororon al la praktika paniko: kaj la cirkuladagantoj timtremas antaŭ la nepenetrebla sekreto de siaj propraj kondiĉoj." (Karlo Markso, l.c., p. 126 <vd MEW, vol. 13, p. 123>. „La malriĉuloj ne havas laboron, ĉar la riĉuloj ne havas monon por dungi ilin, kvankam ili posedas la samajn terojn kaj la samajn laboristojn kiel antaŭe por fabrikigi vivrimedojn kaj vestaĵojn: sed tiuj estigas la veran riĉaĵon de nacio kaj ne la mono." (John Bellers, „Proposals for

En la krizo la kontraŭeco inter la varo kaj ĝia valorformo, la mono, kreskas al absoluta kontraŭdiro. La aperformo de la mono estas pro tio malgrava. La malsatego je mono restas la sama, egale ĉu pagendas en oro aŭ kreditmono, ekzemple bankbiletoj.[154]

Se ni rigardas nun la ĉioman sumon de la mono cirkulanta en donita tempospaco, tiam ĝi estas, ĉe donita cirkuladrapido de la cirkulad- kaj pag-rimedoj, egala al la sumo de la realigendaj varprezoj plus la sumo de la pagendaj sumoj, minus la pagoj kiuj kompensiĝas, minus fine la nombro da cirkuladoj en kiuj la sama monero funkcias alterne jen kiel cirkulad-, jen kiel pag-rimedo. Ekz-e la terkulturisto vendas sian grenon por 2 st.pd-oj, kiuj tiel servas kiel cirkuladrimedo. Je la pagtago li pagas per ili la tolon, kiun la teksisto liveris al li. Tiuj samaj 2 sterlingaj pundoj funkcias nun kiel pagrimedo. La teksisto aĉetas nun biblion kontraŭ kontanta mono – ili funkcias denove kiel cirkuladrimedo – ktp. Eĉ ĉe donitaj prezoj, rapido de la moncirkulado kaj ekonomio de la pagoj, la cirkulanta monkvanto kaj la cirkulanta varkvanto dum certa periodo, ekz-e de unu tago, ne plu kongruas. Varoj cirkulas, kies monekvivalento aperos nur en la estonteco. Aliflanke la pagoj ĉiutage kontraktataj kaj la aliaj samtage pagendaj estas tute nekunmezureblaj grandoj.[155]

raising a Colledge of Industry”, Londono, 1696, p. 3, 4.)

154 Kiel tiaj elementoj estas ekspluatataj de la „amikoj de komerco” [originale: „amis du commerce”]: „Ĉe iu okazo (1839) maljuna posedavida bankisto (de la City) levis en sia privata ĉambro la kovrilon de la skribtablo ĉe kiu li sidis kaj dismetis antaŭ amiko faskon da bankbiletoj; kun granda plezuro li diris, ke tio estas 600.000 sterlingaj pundoj, kiuj estas retenataj por malabundigi la monon, kaj ke ili ĉiuj estas metotaj en cirkuladon post la 3-a horo de la sama tago.” ([H. Roy,] „The Theory of the Exchanges. The Bank Charter Act of 1844”, Londono, 1864, p. 81) La duonoficiala organo „The Observer” rimarkigas la 24-an de aprilo 1864: „Kelkaj tre strangaj onidiroj cirkulas pri la rimedoj uzitaj cele al estigi malabundon de bankbiletoj … Eĉ se povas esti dubinde supozi ke iaj tiaj trukoj uzeblus, la informo pri tio estis tamen tiom disvastiĝinta ke oni devas efektive mencii ĝin.”

155 „La amplekso de la vendoj aŭ kontraktoj, kiuj estas farataj dum certa tago, ne influas la monkvanton kiu cirkulas dum tiu tago, sed en la granda plimulto de la kazoj ĝi certe dissolviĝas en multaj tratoj pri la monkvanto kiu eble cirkulos pli aŭ malpli poste … La hodaŭ akceptitaj tratoj aŭ konsentitaj kreditoj ne bezonas havi ian ajn similecon kun tiuj, kiuj estas akceptitaj aŭ konsentitaj por morgaŭ aŭ postmorgaŭ; anstataŭ tio, multaj el la hodiaŭaj tratoj kaj kreditoj, kiam pagendaj, kongruas kun multe da ŝuldoj kies deveno troviĝas dise en vico da antaŭaj, komplete nedeterminitaj datoj. Tratoj kun 12, 6, 3 aŭ 1 monato da kurtempo ofte alvenas kune, tiel ke ili aparte kreskigas la ŝuldojn pagendajn je iu donita tago …” („The Currency Theory Reviewed; a letter to

La kreditmono fontas rekte el la funkcio de la mono kiel pagrimedo, per tio ke ŝuldatestoj por la venditaj varoj cirkulas siavice por transdono de postuloj de ŝuldata mono. Aliflanke, kiel la kreditsistemo etendiĝas, tiel la funkcio de la mono kiel pagrimedo. Kiel tia ĝi ricevas proprajn ekzistformojn, en kiuj ĝi hejmas en la medio de la grandaj komercaj transakcioj, dum la or- kaj arĝent-monero estas repuŝata precipe en la sferon de la etkomerco.[156]

Ĉe certa nivelo kaj amplekso de la varproduktado la funkcio de la mono kiel pagrimedo transiras la sferon de la varcirkulado. Ĝi fariĝas ĝenerala varo de la kontraktoj.[157] Pensioj, impostoj ktp transformiĝas el liverado de naturaĵoj en monpagojn. Kiom tiu transformiĝo estas kon- diĉita de la ĉioma formo de la produktadprocezo, tion pruvas ekz-e la

---

the Scotch people. By a Banker in England”, Edinburgo, 1845, p. 29, 30 diversl.)

156 Kiel ekzemplo, kiom malmulte da reala mono eniras la ĝuste nomatajn komerc-operaciojn, sekvas ĉi tie la skemo de unu el la plej grandaj londonaj komercfirmaoj (Morrison, Dillon & Co.) pri ĝiaj jaraj monenspezoj kaj pagoj. Ĝiaj transakcioj en la jaro 1856, kiuj entenas multajn milionojn da sterlingaj pundoj, estas mallongigitaj al la mezuro de 1 miliono.

| *Enspezoj* | strl. pd. | *Elspezoj* | **sumo:** strl. pd. |
|---|---|---|---|
| Tratoj de bankistoj kaj komercistoj pagendaj laŭ dato | 553.596 | Tratoj pagendaj laŭ dato | 302.674 |
| Ĉekoj de bankistoj ktp pagendaj ĉe vido | 357.715 | Ĉekoj al Londonaj bankistoj | |
| Landbankaj biletoj | 9.627 | Biletoj de la Banko de Anglio | 663.672 |
| Biletoj de la Banko de Anglio | 68.554 | Oro | 22.743 |
| Oro | 28.089 | Arĝento kaj kupro | 9.427 |
| Arĝento kaj kupro | 1.486 | | 1.484 |
| Poŝtmandatoj | 933 | | |
| **Totala sumo:** | **1.000.000** | **Totala** | **1.000.000** |

157 „La karaktero de la aferrilatoj ŝanĝiĝis tiom ke antstataŭ interŝanĝo de havaĵoj kontraŭ havaĵoj aŭ anstataŭ liverado kaj akcepto, nun okazas vendo kaj pago kaj ĉiuj aferoj … prezentiĝas nun kiel pura monaferoj.” ([D. Defoe,] „An Essay upon Publick Credit”, 3-a eld., Londono, 1710, p. 8)

dufoje fiaskinta provo de la romia imperio kolekti ĉiujn tributojn en formo de mono. La grandega mizero de la franca kamparanaro sub Ludoviko la 14-a, kiun Boisguillebert, marŝalo Vauban ktp tiel elokvente denuncas, estis ŝuldata ne nur al la impostalteco, sed ankaŭ al la transformado de naturecimposto en monimposton.[158] Se aliflanke la naturecformo de la grundrento, en Azio samtempe la ĉefelemento de la ŝtatimposto, baziĝas sur produktadkondiĉoj kiuj reproduktiĝas kun la konstanteco de naturkondiĉoj, tiu pagformo ricevas retroefike la malnovan produktadformon. Ĝi konsistigas unu el la sekretoj de la memkonserviĝo de la turka imperio. Se la ekstera komerco trudita de Eŭropo al Japanio sekvigas la transformiĝon de naturecrento en monrenton[159], tiam tio signifas la pereon de ĝia modela terkulturado. Ties densaj ekonomiaj ekzistadkondiĉoj dissolviĝos.

En ĉiu lando fiksiĝas certaj ĝeneralaj pagdatoj. Ili baziĝas parte, krom sur aliaj cikloj de la reproduktado, sur la naturkondiĉoj de la produktado ligitaj kun la ritmo de la jarsezonoj. Ili regulas ankaŭ pagojn kiuj ne rekte fontas el la varcirkulado, kiel impostojn, rentojn ktp. La monkvanto necesa en tiuj tagoj de la jaro por tiuj pagoj disaj tra la tuta socio, kaŭzas periodajn, sed tute supraĵajn perturbojn en la ekonomio de la pagrimedoj.[160]

---

158 „La mono fariĝis la ekzekutisto de ĉiuj aĵoj.” La financarto estas „la distilbalono, en kiu hororiga amaso da havaĵoj kaj varoj estis vaporigitaj por gajni tiun fatalan ekstrakton”. „La mono deklaras la militon al la tuta homaro.” (Boisguillebert, „Dissertation sur la nature des richesses, de l'argent et des tributs”, eld. Daire, „Économistes financiers”, Parizo, 1843, vol. I, p. 413, 419, 417, 418)

159 <*3-a kaj 4-a eldono:* orrento>

160 „Lundon de pentekosto 1824, rakontas s-ro Craig al la parlamenta esplorkomisiono de 1826, estis tiom granda postulo de bankbiletoj en Edinburgo, ke jam je la 11-a horo ni ne plu havis eĉ unu bileton en nia gardejo. Ni sendis laŭvice homojn al la diversaj bankoj por prunti iujn, sed povis ricevi neniujn, kaj multaj transakcioj fareblis nur per paperpecoj. Je la 3-a posttagmeze tamen jam ĉiuj biletoj estis revenintaj al la bankoj, de kiuj ili devenis. Ili estis nur ŝanĝintaj la manojn.” Kvankam la efektiva mezuma cirkulado de la bankbiletoj en Skotlando sumas malpli ol 3 milionojn da sterlingaj pundoj, tamen, je diversaj pagtagoj en la jaro, ĉiu bileto en posedo de la bankisto, ĉiom proksimume 7 milionoj da sterlingaj pundoj, estas vokataj al aktiveco. „Ĉe tiuj okazoj la biletoj devas plenumi unu solan specifan funkcion, kaj ekde kiam ĝi estas plenumita, ili refluas al la respektivaj bankoj, el kiuj ili venis.” (John Fullarton, „Regulation of Currencies”, 2-a eld. Londono, 1845, p. 86, noto) Por kompreno aldonendas ke en Skotlando tempe

El la leĝo pri la cirkuladrapido de la cirkuladrimedoj sekvas ke por ĉiuj periodaj pagoj, kiom ajn estas ilia fonto, la necesa kvanto da pagrimedoj estas en rekta[161] proporcio kun la daŭro de la pagperiodoj.[162]

La evoluo de la mono kiel pagrimedo necesigas monakumuladojn por la pagdatoj de la ŝuldataj sumoj. Dum la trezorigo malaperas kiel memstara riĉigoformo kun la progreso de la burĝa socio, ĝi inverse kreskas kun ĝi en la formo de rezervofondusoj de la pagrimedoj.

## c) mondmono

Ĉe la eliro el la interna cirkuladsfero la mono demetas la tie alprenitajn lokajn formojn de mezurilo de prezoj, monero, pagmono kaj valorsigno, kaj refalas en la originan ingotformon de la noblaj metaloj. En la mondkomerco la varoj disvolvas universale sian valoron. Ilia memstara valorformo do ankaŭ ĉi tie alpaŝas ilin kiel mondmono. Ne pli frue ol sur la mondmerkato la mono funkcias plene kiel la varo kies naturformo estas samtempe rekta socia realiĝformo de la abstrakta homa laboro. Ĝia estmaniero fariĝas kongrua kun ĝia nocio.

En la interna cirkuladsfero nur unu varo povas servi kiel valormezuro kaj do kiel mono. Sur la mondmerkato regas duobla valormezuro, oro kaj arĝento.[163] La mondmono funkcias kiel ĝenerala pagrimedo, ĝenerala

---

de la skribo de Fullarton oni eldonis ne ĉekojn, sed nur biletojn por la deponaĵoj.

161 <*1-a ĝis 4-a eldono:* inversa>

162 Al la demando, „ĉu, se oni bezonus 40 milionojn jare, tiuj samaj 6 milionoj (da oro) sufiĉus por la okazantaj cirkuladoj, kiujn postulas la komerco?” Petty respondas per sia konata majstreco: „Mi respondas jes: por la sumo de 40 milionoj sufiĉus jam 40/52 de 1 miliono, se la cirkuladoj estus tiom mallongtempaj, t.e. semajnaj, kiel okazas inter malriĉaj metiistoj kaj laboristoj, kiuj ricevas kaj pagas ĉiun sabaton; sed se la pagtagoj estas kvaronjaraj, kiel oni kutime ĉe ni pagas farmaĵojn kaj kolektas impostojn, tiam oni bezonas 10 milionojn. Se ni do supozas, ke ĝenerale la pagoj okazas je diversaj pagtagoj inter 1 kaj 13 semajnoj, tiam oni devas aldoni 10 milionojn al 40/52, el kiu la duono estas proksimume $5^1/_2$ milionoj, tiel ke do $5^1/_2$ milionoj sufiĉus.” (William Petty, „Political Anatomy of Ireland. 1672”, eld. Londono, 1691, p. 13, 14)

163 Pro tio la absurdeco de ĉia leĝo kiu preskribas al la naciaj bankoj akumuli rezervojn nur el tiu nobla metalo kiu funkcias interne de la lando kiel mono. La tiel memkreitaj „belaj malfaĉilaĵoj” ekz-e de la Banko de Anglio estas konataj. Pri la grandaj historiaj epokoj de la relativa valorŝanĝo de oro kaj

aĉetrimedo kaj absolute socia enkorpiĝo de la universala riĉaĵo. La funkcio kiel pagrimedo, por kompensado de internaciaj bilancoj, antaŭregas. Pro tio la frapfrazo de la merkantilsistemo – komerca bilanco![164] Kiel internacia aĉetrimedo oro kaj arĝento servas esence ekde kiam la tradicia ekvilibro de la metabolo inter diversaj nacioj estas subite perturbita. Fine kiel absolute socia enkorpiĝo de la riĉaĵo, kie temas nek pri aĉeto nek pri pago, sed pri transigo de riĉaĵo de unu lando al alia, kaj kie la konjunkturoj de la varmerkato aŭ la plenumenda celo mem ekskludas la transigon

---

arĝento vidu Karlo Markso, l.c. p. 136 s. <vidu volumo 13, p. 131 s.> –aldono al la 2-a eldono: Sir Robert Peel provis en sia Bankact de 1844 forigi la misaĵon per tio ke li permesis al la Banko de Anglio eldoni banknotojn laŭ arĝentingotojn, sed kondiĉe ke la arĝentrezervo estu neniam pli alta ol kvarono de la orrezervo. La arĝentprezo estas ĉe tio taksata laŭ ĝia merkatprezo (en oro) sur la londona merkato. {*Al la 4-a eldono:* – Ni troviĝas ree en epoko de forta relativa valorŝanĝo de oro kaj arĝento. Antaŭ proksimume 25 jaroj la valorrilato de oro al arĝento = $15^1/_2$ : 1, nun ĝi estas proksimume = 22 : 1, kaj arĝento falas ankoraŭ daŭre kontraŭ oro. Tio estas esence la sekvo de profunda transformiĝo en la produktadmaniero de ambaŭ metaloj. Antaŭe oro estis gajnata preskaŭ nur per ellavado de ortenaj aluviaj tavoloj, de eroziproduktoj de ortenaj mineraloj. Nun tiu metodo jam ne sufiĉas kaj cedis la rangon al alia, kiu estis antaŭe nur duavice praktikata, kvankam bone konata jam de la antikvuloj (Diodoro, III, 12-14; Diodor's von Sizilien „Historische Bibliothek”, libro III, 12-14, Stutgarto 1828, p. 258-261), nome la prilaborado de la ortenaj kvarcgangoj mem. Aliflanke oni ne nur malkovris en la okcidento de la nordamerikaj rokmontaroj gigantajn novajn arĝentkuŝejojn, sed tiuj kaj la meksikaj arĝentminejoj estis malfermitaj al la trafiko per fervojoj, ekipitaj per moderna maŝinaro kaj brulaĵo kaj per tio ebliĝis la ekstraktado de arĝento plej grandskale kaj malpli koste. Sed ekzistas granda diferenco en la maniero en kiu la du metaloj aperas en la ercgangoj. La oro estas plej ofte pura, sed kompense ĝi troviĝas disa en tre etaj kvantoj en la kvarco; la tuta gangenhavo estas do pistenda kaj la oro ellavenda resp. per hidrargo eltirenda. Je 1.000.000 gramoj da kvarco oni ricevas per tio ofte apenaŭ 1-3, tre malofte 30-60 gramojn da oro. Arĝento ekzistas malofte pura, sed kompense en propraj ercoj relative facile disigeblaj de la gangmaterialo, kiuj entenas plej ofte 40-90 elcentojn da arĝento; aŭ ĝi estas en malpli grandaj kvantoj entenata en la ercoj de kupro, plumbo ktp, kiuj jam per tio valoras la prilaboradon. Jam el tio sekvas, ke, dum la produktadlaboro de oro tendencas pliiĝi, tiu de arĝento konsiderinde malpliiĝis, ties valorfalo klariĝas tute nature. Tiu valorfalo esprimiĝus per ankoraŭ pli granda prezfalo, se la arĝentprezo ne estus ankoraŭ nun alte tenata per artefaritaj rimedoj. Sed la arĝentriĉaĵoj de Ameriko estas ekspluatataj nur je malgranda parto, kaj tial atendeblas ke la arĝentvaloro ankoraŭ dum iom da tempo restos falanta. Al tio kontribuos eĉ pli la relativa malpliiĝo de la arĝentbezono por uz- kaj luks-

en varformo.[165]

Kiel por sia interna cirkulado, ĉiu lando bezonas por la mondmerkata cirkulado rezervan fonduson. La funkcioj de la trezoroj fontas do parte el la funkcio de la mono kiel interna cirkulad- kaj pag-rimedo, parte el ĝia funkcio kiel mondmono.[166] En tiu lasta rolo ĉiam necesas la reala monvaro, korpa oro kaj arĝento, pro kio James Steuart karakterizas oron kaj arĝenton, alie ol ties nur lokajn reprezentantojn, eksplicite kiel *money of the world*, mondmono.

---

artikloj, ĝia substituado per plakitaj varoj, aluminio ktp. Laŭ tio oni mezuru la utopismon de la dumetalisma ideo ke internacia deviga kurzo realtigus la arĝenton al ĝia malnova valorproporcio de 1 : 15½. Pli verŝajne la arĝento perdos ankaŭ sur la mondmerkato pli kaj pli sian monkvaliton. – F.E.}

164 La kontraŭuloj de la merkantilsistemo, kiu traktis la saldadon de ekscesa komercbilando per oro kaj arĝento kiel celon de la mondkomerco, siavice ja miskomprenis la funkcion de la mondmono. Kiel la malĝusta kompreno de la leĝoj, kiuj reguligas la kvanton de cirkuladrimedoj, nur speguliĝas en la malĝusta kompreno de la internacia moviĝo de la noblaj metaloj, tion mi detale pruvis ĉe Ricardo (l.c., p. 150 s. <Vidu volumon 13, p. 143 s.>). Lia malĝusta dogmo, „Malfavora komercbilando povas estiĝi neniam alie ol per troaĵo da cirkuladrimedoj … La eksportado de moneroj ŝuldiĝas al ties malkareco, kaj estas ne la sekvo, sed la kaŭzo de malfavora bilanco” troviĝas do jam ĉe Barbon: „La komerca bilanco, se estas iu, ne estas la kaŭzo por tio ke mono estas ekportata el iu lando. La eksporto okazas pli ĝuste pro la valordiferenco de la noblaj metaloj en ĉiu lando.” (N. Barbon, l.c., p. 59) MacCulloch en „The Literature of Political Economy: a classified Catalogue”, Londono 1845, laŭdas Barbon-on pro tiu anticipo, sed bonscie evitas eĉ nur mencii la naivajn formojn, en kiuj ĉe B. la absurdaj kondiĉoj de la „currency principle” ankoraŭ aperas. La senkritikeco kaj eĉ malhonesteco de tiu katalogo kulminas en la paragrafoj pri la historio de la monteorio, ĉar MacCulloch, kiel lakeo de Lordo Overstone (eksbankisto Loyd), kiun li nomas *„rekonata reĝo de la monuloj”* („facile princeps argentariorum”), ĉi tie svingas la voston.

165 Ekz-e ĉe monhelpoj, monpruntoj por militado aŭ por rekomenco de pagoj en kontanta mono de bankoj ktp, valoro povas esti bezonata ĝuste en monformo.

166 *Noto al la 2-a eldono:* „Efektive mi ne povus deziri pli konvinkan pruvon por tio ke la meĥanismo de trezorigo en landoj kun metalmono kapablas plenumi ĉian funkcion ĉe pago de internaciaj ŝuldoj, kaj tio sen perceptebla subteno fare de la ĝenerala cirkulado, ol la facilecon, per kiu Francio, kiu estis ĵus resaniĝanta el la skuiĝo kaŭzita de detrua invado, en tempospaco de 27 monatoj plenumis la truditan pagon de preskaŭ 20 milionoj da militkompenso al la aliancitaj potencoj, kaj konsiderindan parton de tiu sumo en metalmono, sen perceptebla restrikto aŭ ĝeno de la enlanda moncirkulado aŭ iaj alarmaj

La moviĝo de la or- kaj arĝentfluo estas duobla. Unuflanke ĝi moviĝas de siaj fontoj tra la tuta mondmerkato, kie ĝi estas diversamplekse kaptata de la diversaj naciaj cirkuladsferoj por eniri ties internajn cirkuladkanalojn, anstataŭi eluzitajn or- kaj arĝent-monerojn, liveri la materialon por luksaj varoj kaj rigidiĝi en trezoroj.[167] Tiu ĉi unua moviĝo estas perata de rekta interŝanĝo de la naciaj laboraĵoj realigitaj en varoj kun la laboro realigita en noblaj metaloj de la or- kaj arĝent-produktantaj landoj. Aliflanke oro kaj arĝento konstante kuras alen kaj reen inter la diversaj naciaj cirkuladsferoj, moviĝo kiu sekvas la senĉesan osciladojn de la interŝanĝkurzoj.[168]

Landoj de evoluinta burĝa produktado limigas la trezorojn amase koncentritajn en bankaj rezervejoj al la minimumo necesa por iliaj specifaj funkcioj.[169] Kun certa escepto, okulfrapa troampleksigo de la trezora rezervejo super ĝia mezuma nivelo montras blokiĝon de la varcirkulado aŭ interrompitan fluon de la varmetamorfozo.[170]

fluktuadoj de la ŝanĝkurzo.” (Fullarton, l.c., p. 141.) *Noto al la 4-a eldono:* Eĉ pli frapan pruvon ni havas en la facileco, per kiu la sama Francio 1871-1873 en 30 monatoj kapablis pagi dekoble pli grandan militkompensaĵon, ankaŭ je konsiderinda parto en metalmono. – F. E.

167 „La mono disdiviĝas al la nacioj laŭ ties bezonoj … per tio ke ĝi estas ĉiam altirata de la produktoj.” (Le Trosne, l.c., p. 916) „La minejoj, kiuj konstante liveras oron kaj arĝenton, estas sufiĉe fruktodonaj por liveri al ĉiu nacio tiun nesecan kvanton.” (J. Vanderlint, l.c., p. 40)

168 „La interŝanĝkurzoj altiĝas kaj falas ĉiusemajne, ili altiĝas en certaj tempoj de la jaro malfavore al iu nacio kaj atingas alitempe la saman altecon je ĝia avantaĝo.” (N. Barbon, l.c., p. 39)

169 Tiuj diversaj funkcioj povas danĝere konfliktiĝi, ekde kiam aldoniĝas konvertad-fonduso por bankbiletoj.

170 „Se ekzistas pli da mono ol nepre necesa por la enlanda komerco, [tio] konsistigas mortan kapitalon kaj alportas al la lando, kiu posedas ĝin, nenian gajnon, escepte se ĝi estas mem eksportata respektive importata.” (John Bellers, „Essays etc.”, p. 13) „Sed kion fari, se ni havas tro da stampita mono? Ni povas tiam fandi la plenpezan kaj transformi ĝin al luksa manĝilaro, al ujoj kaj mebloj el oro kaj arĝento; aŭ sendi ĝin kiel varon tien kie estas bezono kaj postulo je ĝi; aŭ alprunti ĝin laŭ interezo, kie oni pagas altan interezkvoton.” (W. Petty, „Political anatomy of Ireland”, p. 14, 15)

# DUA SEKCIO – La transformado de mono en kapitalon

## *KVARA ĈAPITRO – Transformado de mono en kapitalon*

### 1. La ĝenerala formulo de la kapitalo

La varcirkulado estas la elirpunkto de la kapitalo. Varproduktado kaj evoluinta varcirkulado kaj komerco konsistigas la historiajn kondiĉojn, sub kiuj ĝi estiĝas. Mondkomerco kaj mondmerkato malfermas en la 16-a jarcento la modernan vivhistorion de la kapitalo.

Se ni pretervidas la materian enhavon de la varcirkulado, la interŝanĝon de la diversaj uzvaloroj, kaj rigardas nur la ekonomiajn formojn kiujn tiu procezo produktas, tiam ni trovas kiel ĝian lastan produkton la monon. Tiu lasta produkto de la varcirkulado estas la unua aperformo de la kapitalo.

Historie la kapitalo alpaŝas la grundproprieton ĉie unue en la formo de mono, kiel monhavaĵo, komercistkapitalo kaj uzurkapitalo.[1] Sed ne necesas retrorigardo al la estiĝhistorio de la kapitalo por ekkoni la monon kiel ties unuan aperformon. La sama historio okazas ĉiutage antaŭ niaj okuloj. Ĉiu nova kapitalo unue suriras la scenejon, t.e. la merkaton, la varmerkaton, labormerkaton aŭ monmerkaton, daŭre kiel mono, mono kiu, per certaj procezoj, devas transformiĝi en kapitalon.

Mono kiel mono kaj mono kiel kapitalo distingiĝas unue nur per siaj diversa cirkuladformo

La plej rekta formo de la varcirkulado estas vr – m – vr, transformo de varo en monon kaj retransformado de mono en varon, vendi por aĉeti. Sed apud tiu formo ni trovas duan, specife diversan, la formon m – vr – m, transformo de mono en varon kaj retransformado de varo en monon, aĉeti

1 La kontrasto inter la povo de la grundproprieto baziĝanta sur personaj servut- kaj dominad-rilatoj kaj la senpersona povo de la mono estas klare esprimita en la du francaj proverboj: „Nulle terre sans seigneur” <„Neniu lando sen grundsinjoro”>, „L'argent n'a pas de maître” <„Mono ne havas mastron”>.

por vendi. Mono, kiu en sia moviĝo montras tiun lastan cirkuladon, transformiĝas en kapitalon, fariĝas kapitalo kaj estas jam kapitalo laŭ sia destino.

Ni rigardu nun pli detale la cirkuladon m – vr – m. Ĝi trairas, same kiel la simpla varcirkulado, du kontraŭajn fazojn. En la unua fazo, m – vr, aĉeto, la mono estas transformata en varon. En la dua fazo, vr – m, vendo, la varo estas retransformata en monon. Sed la unueco de la du fazoj estas la tuta moviĝo, kiu interŝanĝas monon kontraŭ varo kaj tiun ree kontraŭ mono, aĉetas varon por vendi ĝin, aŭ se oni neglektas la formalajn diferencojn de aĉeto kaj vendo, aĉetas per la mono varon kaj per la varo monon.[2] La rezulto, en kiu la tuta procezo estingiĝas, estas interŝanĝo de mono kontraŭ mono, m – m. Se mi aĉetas por 100 sterlingaj pundoj 2.000 funtojn da kotono kaj vendas tiujn 2.000 funtojn da kotono por 110 pundoj sterlingaj, tiam mi fine interŝanĝis 100 sterlingajn pundojn kontraŭ 110 sterlingaj pundoj, monon kontraŭ mono.

Evidentas ke la cirkuladprocezo m – vr – m estus absurda kaj senenhava, se oni volus per tiu ĉirkaŭvojo interŝanĝi la saman monvaloron kontraŭ la sama monvaloro, do ekz-e 100 sterlingajn pundojn kontraŭ 100 sterlingaj pundoj. Senkompare pli simpla kaj sekura restus la metodo de la trezorfaristo, kiu retenas siajn 100 sterlingajn pundojn, anstataŭ elmeti ilin al la cirkulad-danĝero. Aliflanke, egale ĉu la komercisto revendas la kotonon aĉetitan per 100 sterlingaj pundoj kontraŭ 110 sterlingaj pundoj, aŭ ĉu li devas cedi ilin por 100 sterlingaj pundoj aŭ eĉ por 50 sterlingaj pundoj, en ĉiuj cirkonstancoj lia mono montris apartan kaj originalan moviĝon, ja tute alispecan ol en la simpla varcirkulado, ekz-e en la mano de la kampulo kiu vendas grenon kaj per la tiel ricevita mono aĉetas vestaĵojn. Gravas do unue la speco de la formdiferencoj inter la cirkuladoj m – vr – m kaj vr – m – vr. Per tio montriĝos samtempe la enhava diferenco kiu embuskas malantaŭ tiuj formaj diferencoj.

Ni vidu unue tion, kio estas al ambaŭ formoj komuna.

Ambaŭ cirkuladoj konsistas el la samaj du kontraŭaj fazoj, vr – m, vendo, kaj m – vr, aĉeto. En ĉiu el la du fazoj la samaj du materiaj elementoj staras unu kontraŭ la alia, varo kaj mono – kaj du personoj en la samaj ekonomiaj karaktermaskoj, aĉetanto kaj vendanto. Ĉiu el la du cirkuladoj estas la unueco de la samaj kontraŭaj fazoj, kaj ambaŭfoje tiu unueco estas perata de la apero de tri kontraŭuloj, el kiuj la unua nur

2 „Per mono oni aĉetas varojn, kaj per varoj oni aĉetas monon.” (Mercier de la Riviè[re], „L'ordre naturel et essentiel des sociétés politiques”, p. 543)

vendas, la alia nur aĉetas, sed la tria alterne aĉetas kaj vendas.

Sed kio dekomence distingas la du cirkuladojn vr – m – vr kaj m – vr – m, estas la inversa vico de la samaj kontraŭaj cirkuladfazoj. La simpla varcirkulado komencas per la vendo kaj finiĝas per la aĉeto, la cirkulado de la mono kiel kapitalo komenciĝas per la aĉeto kaj finiĝas per la vendo. Tie la varo, ĉie tie la mono formas la elirpunkton kaj la finan punkton de la moviĝo. En la unua formo la mono peras, en la alia inverse la varo peras la tutan procezon.

En la cirkulado vr – m – vr la mono estas fine transformita en varon kiu servas kiel uzvaloro. La mono estas do definitive elspezita. En la inversa formo m – vr – m la aĉetanto male elspezas monon por enspezo de mono kiel vendanto. Ĉe aĉeto de la varo li ĵetas monon en la cirkuladon, por eltiri ĝin poste per la vendo de la sama varo. Li delasas la monon nur kun la insida intenco rehavi ĝin. Pro tio ĝi estas nur antaŭpagata.[3]

En la formo vr – m – vr la sama monero ŝanĝas dufoje la lokon. La vendanto ricevas ĝin de la aĉetanto kaj forpagas ĝin al alia vendanto. La ĉioma procezo, kiu komenciĝas per la enspezo de mono por varo, finiĝas per la fordono de mono por varo. Inverse okazas en la formo m – vr – m. Ne la sama mono ŝanĝas ĉi tie dufoje la lokon, sed la sama varo. La aĉetanto ricevas ĝin el la mano de la vendanto kaj fordonas ĝin en la manon de alia aĉetanto. Kiel en la simpla varcirkulado la dufoja lokŝanĝo de la sama mono efikas sian definitivan transiĝon el unu mano en la alian, tiel ĉi tie la dufoja lokŝanĝo de la sama varo efikas la refluon de la mono al sia unua elirpunkto.

La refluo de la mono al sia elirpunkto ne dependas de tio ĉu la varo estas vendata pli altpreze ol ĝi estis aĉetita. Tiu cirkonstanco influas nur la grandon de la refluanta monsumo. La fenomeno de la refluo mem okazas, ekde kiam la aĉetita varo estas revendata, do kiam la cirkulado m – vr – m estas plenumita. Tio estas do sense perceptebla diferenco inter la cirkulado de la mono kiel kapitalo kaj ĝia cirkulado kiel nura mono.

La cirkulado vr – m – vr estas komplete plenumita, ekde kiam la vendo de varo alportas monon kiun la aĉeto de alia varo reprenas. Se tamen okazas refluo de la mono al sia elirpunkto, tiam nur per la novigo aŭ ripetado de la tuta cirkulado. Se mi aĉetas kvarton da greno por 3 sterlingaj

3 „Se iu aĵo estas aĉetata por esti revendota, oni nomas la sumon uzatan por tio antaŭpagata mono; se ĝi estas aĉetata por ne esti revendota, tiam oni povas nomi ĝin elspezita” (James Steuart, „Works etc.”, edited by General Sir James Steuart, his son, Londono, v. I, p. 274)

pundoj kaj per tiuj 3 sterlingaj pundoj aĉetas vestaĵojn, tiam la 3 sterlingaj pundoj estas por mi definitive elspezitaj. Mi havas jam nenion por fari kun ili. Ili apartenas al la vestaĵkomercisto. Se mi nun vendas duan kvart-on da greno, tiam la mono refluas al mi, sed ne sekve al la unua trans-akcio, sed nur sekve al ĝia ripetiĝo. Ĝi ree malproksimiĝas de mi, ekde kiam mi finas la duan transakcion kaj denove aĉetas. En la cirkulado vr – m – vr la elspezo de la mono havas do nenion por fari kun ĝia refluo. Sed en m – vr – m, la refluo de la mono estas kondiĉita de la maniero mem de ĝia elspezo. Sen tiu refluo la operacio estas malsukcesa aŭ la procezo interrompita kaj ankoraŭ ne plenumita, ĉar mankas ĝia dua fazo, la vendo kompletiganta kaj finanta la aĉeton.

La cirkulado vr – m – vr eliras ĉe la ekstremaĵo de unu varo kaj finiĝas ĉe la ekstremaĵo de alia varo kiu elfalas el la cirkulado kaj alfalas al la konsumado. Konsumado, kontentigo de bezonoj, unuvorte, uzvaloro estas do ĝia fina celo. La cirkulado m – vr – m, male, eliras ĉe la ekstremaĵo de la mono kaj fine revenas al la sama ekstremaĵo. Ĝia movanta motivo kaj decidanta celo estas do la interŝanĝvaloro mem.

En la simpla varcirkulado ambaŭ ekstremaĵoj havas la saman ekono-mian formon. Ili ambaŭ estas varo. Ili estas ankaŭ varoj de la sama valor-grando. Sed ili estas kvalite malsamaj uzvaloroj, ekz-e greno kaj vestaĵoj. La produktinterŝanĝo, la ŝanĝo de la diversaj materialoj en kiuj la socia laboro prezentas sin, konsistigas ĉi tie la enhavon de la moviĝo. Alie en la cirkulado m – vr – m. Tiu ŝajnas unuavide senenhava, ĉar taŭtologia, ambaŭ ekstremaĵoj havas la saman ekonomian formon. Ili estas ambaŭ mono, do ne kvalite malsamaj uzvaloroj, ĉar mono estas ja la transformita formo de la varoj, en kiu iliaj apartaj uzvaloroj estas estingitaj. Unue interŝanĝi 100 sterlingajn pundojn kontraŭ kotono kaj poste tiun saman kotonon kontraŭ 100 sterlingaj pundoj, do tra ĉirkaŭvojo mono en monon, la samon kontraŭ la samo, ŝajnas esti same senutila kiel absurda opera-cio.[4] Monsumo povas distingiĝi de alia monsumo entute nur per sia

4 „Oni ne interŝanĝas monon kontraŭ mono”, krias Mercier de la Rivière al la merkantilistoj (l.c., p. 486). En verko kiu traktas profesie pri „komerco” kaj „spekulado”, oni legas: „Ĉia komerco konsistas el interŝanĝo de diversspecaj aĵoj; kaj la avantaĝo (ĉu por la komercisto?) fontas ĝuste el tiu diverseco. Interŝanĝi funton da pano kontraŭ funto da pano estus sen ajna avantaĝo … pro tio la avantaĝa kontrasto inter komerco kaj ludo, kiu estas nur interŝanĝo de mono kontraŭ mono.” (Th. Corbet, „An Inquiry into the Causes and Models of the Wealth of Individuals; or the Principles of Trade and Speculation explained”, Londono, 1841, p. 5) Kvankam Corbet ne vidas, ke interŝanĝi m – m, monon kontraŭ mono, estas la karakteriza cirkuladformo ne

grando. Pro tio, la procezo m – vr – m ŝuldas sian enhavon al nenia kvalita diferenco de siaj ekstremaĵoj, ĉar ili ambaŭ estas mono, sed nur al sia kvanta malsameco. Fine oni eltiras el la cirkulado pli da mono ol oni komence enĵetis. La kotono aĉetita per 100 sterlingaj pundoj estas ekz-e revendata je 100 + 10 sterlingaj pundoj aŭ 110 sterlingaj pundoj. La kompleta formo de tiu procezo estas do m – vr – m', ĉe kio m' = m + dm, do egala al la komence antaŭpagita monsumo plus kromaĵo. Tiun kromaĵon aŭ la kromaĵon super la origina valoro mi nomas – plusvaloro (surplus value). La origine antaŭpagita valoro do ne konserviĝas en la cirkulado, sed en ĝi ĝi ŝanĝas sian valorgrandon, aldonas plusvaloron aŭ plivalorigas sin. Kaj tiu movo ŝanĝas ĝin en kapitalon.

Estas vere ke eblas ankaŭ ke en vr – m – vr la du ekstremaĵoj vr, vr, ekz-e greno kaj vestaĵoj, estas kvante malsamaj valorgrandoj. La kampulo povas vendi sian grenon super la valoro aŭ aĉeti la vestaĵojn sub ilia valoro. Li povas siavice esti trompata de la vestaĵkomercisto. Sed tia valordiferenco restas por tiu cirkuladformo pure hazarda. Ĝi ne perdas sian sencon, kiel la procezo m – vr – m, se la du ekstremaĵoj, ekz-e greno kaj vestaĵoj, estas ekvivalentaj. Male, ilia samvaloreco estas la kondiĉo de la normala procezo.

La ripetado aŭ renovigo de la vendo, por aĉeti, trovas, kiel tiu procezo mem, mezuron kaj celon en fina celo ekstere de ĝi, en la konsumado, en la kontentigo de certaj bezonoj. En la aĉeto por vendo, male, komenco kaj fino estas la samo, mono, interŝanĝvaloro, kaj jam per tio la movo estas senfina. Tamen el m fariĝis m + dm, el la 100 sterlingaj pundoj, 100 + 10. Sed konsidere nur la kvaliton, 110 sterlingaj pundoj estas limigita valorsumo kiel 100 sterlingaj pundoj. Se la 110 sterlingaj pundoj estus elspezitaj kiel mono, tiam ili falus el sia rolo. Ili ĉesus esti kapitalo. Eltiritaj el la cirkulado, ili rigidiĝas fariĝante trezoro, kaj neniu monereto alkreskas al

nur de la komerca kapitalo, sed de ĉia kapitalo, li almenaŭ koncedas ke tiu maniero de komercado, de spekulado estas komuna kun la ludo, sed poste venas MacCulloch kaj trovas, ke aĉeti por vendi estas spekulado, kaj la diferenco inter spekulado kaj komerco do forfalas. „Ĉia negoco, ĉe kiu iu persono aĉetas produktaĵon por revendi ĝin, estas fakte spekulado.” (MacCulloch, „A Dictionary, practical etc. of Commerce”, Londono, 1847, p. 1009) Senkompare pli naive estas Pinto, la Pindaro de la Amsterdama borso: „La komerco estas ludo (tiu frazo pruntita el Locke), kaj ĉe almozpetantoj oni povas nenion gajni. Se oni dum longa tempo ĉion forprenintus de ĉiuj, tiam oni devus en bona interkonsento redoni la plej grandan parton de la gajno, por rekomenci la ludon.” (Pinto, „Traité de la Circulation et du Crédit”, Amsterdamo 1771, p. 231)

ili, eĉ se ili kuŝas tiel ĝis la mondofino. Do, ekde kiam temas pri plivalorigo de la valoro, tiam la sama bezono ekzistas por plivalorigi 110 sterlingajn pundojn kiel por 100 sterlingaj pundoj, ĉar ambaŭ estas limigitaj esprimoj de la interŝanĝvaloro, ambaŭ havas do la saman destinon proksimiĝi al riĉaĵo ĝenerale, per etendo de grando. Estas vere ke la origine antaŭpagita valoro de 100 sterlingaj pundoj distingiĝas por momento de la plusvaloro de 10 sterlingaj pundoj kiu alkreskas al ili en la cirkulado, sed tiu diferenco tuj disfluas. Ĉe la fino de la procezo elvenas ne ĉe la unua flanko la origina valoro de 100 sterlingaj pundoj kaj ĉe la alia flanko la plusvaloro de 10 sterlingaj pundoj. Tio, kio elvenas, estas valoro de 110 sterlingaj pundoj, kiu troviĝas tute same en la taŭga formo por komenci la plivalorigprocezon, kiel la originaj 100 sterlingaj pundoj. Mono elvenas ĉe la fino de la movo en la funkcio de ĝia komenco.[5] La fino de ĉiu unuopa cirkulado, en kiu plenumiĝas la aĉeto por vendo, konsistigas do per si mem la komencon de nova cirkulado. La simpla varcirkulado – la vendo por aĉeto – servas kiel rimedo por fina celo kiu troviĝas ekster la cirkulado, la alproprigo de uzvaloroj, la kontentigo de bezonoj. La cirkulado de la mono kiel kapitalo, male, estas memcelo, ĉar la plivalorigo de la valoro ekzistas nur ene de tiu ĉiam renovata moviĝo. La moviĝo de la kapitalo estas do senmezura.[6]

5 „La kapitalo konsistas … el la origina kapitalo kaj la gajno, la alkresko de la kapitalo … kvankam la praktiko mem tuj aldonas tiun gajnon al la kapitalo kaj cirkuligas ĝin kun tiu.” (F. Engelso, „Umrisse zu einer Kritik der Nationalökonomie”, en „Deutsch-Französische Jahrbücher”, eldonitaj de Arnold Ruge kaj Karlo Markso, Parizo, 1844, p. 99. <Vidu MEW, vol. 1, p. 511>)

6 Aristotelo kontraŭmetas al la ĥrematistiko la ekonomikon. Li eliras de la ekonomiko. Laŭ la mezuro en kiu ĝi estas akirarto, ĝi limiĝas al akiro de la havaĵoj necesaj por la vivo kaj por la domo aŭ por la ŝtato. „La vera riĉaĵo (ὁ ἀλεθινὸς πλοῦτος [greke:] ho alethinos plutos) konsistas el tiaj uzvaloroj; ĉar la por la bona vivo sufiĉa mezuro de tiuspeca posedaĵo ne estas senlima. Sed ekzistas dua akirarto, kiu prefere kaj prave nomiĝas ĥrematistiko, sekve al kiu ŝajnas ne ekzisti limo de riĉaĵo kaj de posedaĵo. La varkomerco („ῃ καπελικὴ” [greke: „he kapelike”]) nomiĝas laŭvorte aĵkomerco, kaj Aristotelo uzas tiun formon, ĉar en ĝi la uzvaloro antaŭregas) apartenas denature ne al la ĥrematistiko, ĉar ĉi tie la interŝanĝo koncernas nur la por ili mem (aĉetanto kaj vendanto) nesesa.” Pro tio, li daŭrigas, ankaŭ la origina formo de la varkomerco estis la interŝanĝkomerco, sed kun ĝia etendiĝo estiĝis necese la mono. Kun la invento de la mono, la interŝanĝkomerco devis nepre evolui al la kaphlikh, al la varkomerco, kaj tiu, en kontraŭdiro kun sia origina tendenco, elformiĝis al ĥrematistiko, al la arto akiri monon. Sed la ĥrematistiko distingiĝas siavice de la ekonomiko per tio ke „por ĝi la cirkulado estas la fonto de la riĉaĵo (ποιητικὴ χρημάτων … διὰ χρεμάτων μεταβολῆς [greke:] pojetike ĥrematon

Kiel konscia portanto de tiu moviĝo, la monposedanto fariĝas kapitalisto. Lia persono, aŭ pli ĝuste lia poŝo, estas la elirpunkto kaj la revenpunkto de la mono. La objektiva enhavo de tiu cirkulado – la plivalorigo de la valoro – estas lia subjektiva celo, kaj nur en tio ke kreskanta alproprigo de la abstrakta riĉaĵo estas la movanta motivo de liaj operacioj, li funkciis kiel kapitalisto aŭ kiel personigita, per volo kaj konscio dotita kapitalo. La uzvaloro estas do neniam traktenda kiel rekta celo de la kapitalisto. [7] Ankaŭ ne la unuopa gajno, sed nur la senlaca moviĝo de la gajno.[8] Tiu absoluta riĉiĝinstinkto, tiu pasia ĉasado de valoro[9] estas komuna trajto de la kapitalisto kaj de la trezorfaristo, sed dum la trezorfaristo estas nur la freneza kapitalisto, la kapitalisto estas la racia trezorfaristo. La senlacan pliigon de la valoro kiun la trezorfaristo alstrebas per tio ke li provas savi la monon kontraŭ la cirkulado[10], la pli

… dia ĥrematon metaboles). Kaj ĝi ŝajnas turniĝi ĉirkaŭ la mono, ĉar la mono estas la komenco kaj la fino de tia interŝanĝo (τὸ γὰρ νόμισμα στοιχεῖν καὶ πέρας τῇς ἀλλαγῇς ἑστίν [greke:] to gar nomisma stoikheion tes allages estin). Pro tio ankaŭ la riĉaĵo, kiun ĝi alstrebas, estas senlima. Same kiel ĉia arto, kiu konsideras sian celon ne kiel rimedon sed kiel finan celon, estas senlima en sia strebado, ĉar ĝi ĉiam provas pli proksimiĝi al ĝi, dum la artoj kiuj uzas nur rimedojn por celoj, ne estas senlimaj, ĉar la celo mem metas al ili la limon, tiel ankaŭ por tiu ĥrematistiko ne ekzistas limo por ĝia celo, sed la celo estas la absoluta riĉiĝo. La ekonomiko, ne la ĥrematistiko, havas limon … la unua celas ion malsaman ol la mono mem, la alia ĝian pliigon … La konfuzo de la du formoj, kiuj interagas, instigas iujn konsideri la konservadon kaj pliigon de la mono en la senlimon kiel fincelon de la ekonomiko." (Aristotelo, „De Rep.", eld. Bekker, lib. l.c. 8 kaj 9 diversl.)

7 „Varoj (ĉi tie en la senco de uzvaloroj) ne estas la fina celo de la komercanta kapitalisto … lia fincelo estas mono." (Th. Chalmers, „On Politic. Econ. etc.", 2nd edit., Glasgovo, 1832, p. 165, 166)

8 „Kvankam la komercisto ne malestimas la jam ricevitan gajnon, lia rigardo estas ja ĉiam direktita al la estonta gajno." (A. Genovesi, „Lezioni di Economia Civile" (1765), eldono de la italaj ekonomikistoj de Custodi, Parte Poderna, t. VIII, p. 139)

9 „La neestingebla pasio por la gajno, la auri sacra fames <la damnita malsato je oro> ĉiam determinas la kapitaliston." (MacCulloch, „The Principles of Polit. Econ.", Londono, 1830, p. 179) Tiu kompreno kompreneble ne malhelpas la saman MacCulloch kaj liaspeculojn, ĉe teoriaj embarasoj, ekz-e ĉe traktado de la superproduktado, transformi la saman kapitaliston en bonan civitanon kiu zorgas nur pri la uzvaloro kaj kiu eĉ disvolvas veran lupmalsaton por botoj, ĉapeloj, ovoj, kotonaĵoj kaj aliaj plej familiaraj specoj de uzvaloro.

10 „Σώζειν" <greke: „sozein" „savi"> estas unu el la karakterizaj esprimoj de la grekoj por trezorfarado. Same, „to save" signifas samtempe savi kaj ŝpari.

saĝa kapitalisto atingas per tio ke li fordonas ĝin ĉiam denove al la cirkulado.[11]

La memstaraj formoj, la monformoj, kiujn la valoro de la varoj en la simpla cirkulado alprenas, nur peras la varinterŝanĝon kaj malaperas en la fina rezulto de la moviĝo. En la cirkulado m – vr – m, male, ambaŭ, varo kaj mono, funkcias nur kiel diversaj ekzistadmanieroj de la valoro mem, la mono ĝia ĝenerala, la varo ĝia aparta, por tiel diri nur maskita ekzistadmaniero.[12] Ĝi transiras konstante el unu formo en la alian, sen perdiĝi en tiu moviĝo, kaj tiel transformiĝas en aŭtomatan subjekton. Se oni fiksas la apartajn aperformojn kiujn la valoriĝanta valoro alprenas en la cirkulado de sia vivo, tiam oni ricevas la klarigojn: kapitalo estas mono, kapitalo estas varo.[13] Sed fakte la valoro fariĝas ĉi tie subjekto de procezo en kiu ĝi, sub konstanta ŝanĝo de la formoj de mono kaj varo, ŝanĝas sian grandon mem, kiel plusvaloro deiĝas de si mem kiel origina valoro, plivalorigas sin mem. Estas tiel ĉar la moviĝo, per kiu ĝi aldonas plusvaloron, estas ĝia propra moviĝo, ĝia plivalorigo estas do memplivalorigo. Ĝi ricevis la okultan kvaliton estigi valoron, ĉar ĝi estas valoro. Ĝi naskas vivantajn idojn aŭ almenaŭ metas orajn ovojn.

Kiel la transiga subjekto de tia procezo, en kiu ĝi jen alprenas, jen demetas monformon kaj varformon, sed en tiu ŝanĝiĝo konserviĝas kaj etendiĝas, la valoro bezonas antaŭ ĉio memstaran formon, per kiu ĝia identeco kun si mem konstateblas. Kaj tiun formon ĝi posedas nur en la mono. Tiu do konsistigas la elirpunkton kaj la finpunkton de ĉia plivalorigprocezo. Ĝi estis 100 sterlingaj pundoj, ĝi estas nun 110 sterlingaj pundoj ktp. Sed la mono mem validas ĉi tie nur kiel unu formo de la valoro, ĉar ĝi havas du da ili. Sen la alpreno de varformo la mono ne fariĝas kapitalo. La mono ĉi tie do ne aperas polemike kontraŭ la varo, kiel en la trezorigo. La kapitalisto scias, ke ĉiuj varoj, kiom ajn mizeraj ili aspektas aŭ malbone fetoras, estas en kredo kaj en vero mono, interne cirkumciditaj judoj kaj krome miraklofaraj rimedoj por fari el mono pli da mono.

11 „La senfinon, kiun la aĵoj ne havas en progresado, ili havas en la cirkulado." (Galiani, [l.c., p. 156])

12 „Ne la materialo konsistigas la kapitalon, sed la valoro de tiuj materialoj." (J. B. Say, „Traité d'Écon. Polit.", 3ème éd., Parizo, 1817, vol. II, p. 429)

13 „La cirkuladrimedo (!), kiu estas uzata por produktivaj celoj, estas kapitalo." (Macleod, „The Theory and Practice of Banking", Londono, 1855, v. I, c. 1, p. 55) „Kapitalo egalas varojn." (James Mill, „Elements of Pol. Econ.", Londono, 1821, p. 74)

Dum en la simpla cirkulado la valoro de la varoj, kontraste al la uzvaloro, ricevas maksimume la memstaran formon de mono, ĉi tie ĝi subite prezentiĝas kiel aganta, mem moviĝanta substanco, por kiu varo kaj mono estas ambaŭ nuraj formoj. Sed plie. Anstataŭ prezenti varrilatojn, ĝi nun por tiel diri eniras privatan rilaton kun si mem. Ĝi distingiĝas kiel origina valoro de si mem kiel plusvaloro, kiel Di-patro de si mem kiel Di-filo[14], kaj ambaŭ estas samaĝaj kaj fakte nur unu persono, ĉar nur per la plusvaloro de 10 sterlingaj pundoj la antaŭpagitaj 100 sterlingaj pundoj fariĝas kapitalo. Ekde kiam ili fariĝis tia, ekde kiam la filo kaj per la filo la patro estas generita, ilia diferenco malaperas kaj ambaŭ estas unu, 110 sterlingaj pundoj.

La valoro fariĝas do procezanta valoro, procezanta mono kaj, kiel tia, kapitalo. Ĝi devenas el la cirkuladsfero, reeniras ĝin, konserviĝas kaj obliĝas en ĝi, revenas pli granda el ĝi kaj rekomencas la saman cirkuladon denove.[15] m – m', mongenera mono – money which begets money – tia la priskribo de la kapitalo en la buŝo de ĝiaj unuaj tradukistoj, de la merkantilistoj.

Aĉeti por vendi, aŭ pli komplete, aĉeti por vendi pli altpreze, m – vr – m', tio ŝajnas esti formo propra nur al unu speco de kapitalo, de la komercista kapitalo. Sed ankaŭ la industria kapitalo estas mono, kiu transformiĝas en varon kaj per la vendo de la varo retransformiĝas en pli da mono. Agoj, kiuj okazas ekzemple inter la aĉeto kaj la vendo, ekster la cirkuladsfero, ŝanĝas neniom de tiu formo de moviĝo. En la interezporta kapitalo fine la cirkulado m – vr – m' prezentiĝas mallongigite, en sia rezulto sen la perado, por tiel diri en konciza stilo, kiel m – m', mono, kiu egalas al pli da mono, valoro, kiu estas pli granda ol ĝi mem.

Efektive do m – vr – m' estas la ĝenerala formulo de la kapitalo, kia ĝi aperas rekte en la cirkuladsfero.

## 2. Kontraŭdiroj de la ĝenerala formulo

La cirkuladformo, en kiu la mono fariĝas kapitalo, kontraŭdiras ĉiujn antaŭe esploritajn leĝojn pri la naturo de varo, de valoro, de mono kaj de

14 Aludo al la kristana nocio de Triunuo, kiu esprimas la unuecon de samsubstancaj „personoj” de Dio, nome: Patro, Filo (Jesuo) kaj Sankta Spirito), per kiuj Dio revelaciiĝas. -vl

15 „Kapitalo … konstanta multobliĝanta valoro.” (Sismondi, „Nouveaux Principes d'Écon. Polit.”, vol. I, p. 89.)

la cirkulado mem. Tio, kio distingas ĝin disde la simpla varcirkulado, estas la inversa vico de la samaj du kontraŭaj procezoj, vendo kaj aĉeto. Kaj kiel tia pure formala diferenco povas kvazaŭ sorĉe ŝanĝi la naturon de tiuj procezoj?

Plie. Tiu inversigo ekzistas nur por unu el la tri komercaj partneroj, kiuj komercas inter si. Kiel kapitalisto mi aĉetas varon de A kaj vendas ĝin al B, dum mi kiel simpla varposedanto vendas varon al B kaj poste aĉetas varon de A. Por la partneroj A kaj B ne ekzistas tiu diferenco. Ili aperas nur kiel aĉetanto aŭ vendanto de varoj. Mi mem alpaŝas ilin ĉiufoje kiel simpla monposedanto aŭ varposedanto, aĉetanto aŭ vendanto, kaj pli precize mi alpaŝas ilin en ambaŭ vicoj al la unua persono nur kiel aĉetanto kaj al la alia nur kiel vendanto, al la unua nur kiel mono, al la alia nur kiel varo, al neniu el ili kiel kapitalo aŭ kapitalisto aŭ reprezentanto de io ajn kio estus pli ol mono aŭ varo aŭ povus havi alian efikon ol tiu de la mono aŭ de la varo. Por mi, aĉeto de A kaj vendo al B konsistigas vicon. Sed la kunteksto inter tiuj du agoj ekzistas nur por mi. A fajfas pri mia transakcio kun B, kaj B pri mia transakcio kun A. Se mi ekzemple volus klarigi al ili la apartan meriton kiun mi akiras per la inversigo de la vico, ili pruvus al mi ke mi mem eraras pri la vico kaj ke la ĉioma transakcio ne komenciĝis per aĉeto kaj finiĝis per vendo, sed inverse komenciĝis per vendo kaj finiĝis per aĉeto. Efektive, mia unua ago, la aĉeto, estis el la vidpunkto de A vendo, kaj mia dua ago, la vendo, estis el la vidpunkto de B aĉeto. Ne kontentaj per tio, A kaj B deklaros ke la tuta vico estis superflua kaj nura blago. A vendos la varon rekte al B kaj B aĉetos ĝin rekte de A. Per tio, la tuta transakcio ŝrumpas en unuflankan agon de la ordinara varcirkulado, el la vidpunkto de A nura vendo kaj el la vidpunkto de B nura aĉeto. Do, per la inversigo de la vico ni transiris la sferon de la simpla varcirkulado kaj devas, anstataŭ tio, esplori, ĉu ĝi permesas laŭ sia naturo plivalorigon de la valoroj kiuj eniras ĝin kaj do estiĝon de plusvaloro.

Ni prenu la cirkuladprocezon en formo en kiu ĝi prezentiĝas kiel nura varinterŝanĝo. Tio estas ĉiam la kazo, kiam ambaŭ varposedantoj aĉetas varojn de si reciproke kaj la bilanco de iliaj reciprokaj monpostuloj kompensiĝas en la pagdato. La mono servas ĉi tie kiel kalkulmono, por esprimi la valorojn de la varoj en iliaj prezoj, sed ne alpaŝas mem korpe la varojn. Se temas pri la uzvaloro, estas klare ke ambaŭ interŝanĝantoj povas gajni. Ambaŭ vendas varojn, kiuj estas por ili senutilaj, kaj ricevas varojn, kiujn ili bezonas por uzado. Kaj tiu utilo povas esti ne la sola. A, kiu vendas vinon kaj aĉetas grenon, produktas eble pli da vino ol la

grenkultivisto B en la sama labortempo povus produkti, kaj la grenkultivisto B en la sama labortempo pli da greno, ol la vinproduktanto A povus produkti. A ricevas do por la sama interŝanĝvaloro pli da greno kaj B pli da vino, ol se ĉiu el ambaŭ, sen interŝanĝo, devintus produkti vinon kaj grenon por si mem. Koncerne la uzvaloron eblas do diri ke *„la interŝanĝo estas transakcio, en kiu ambaŭ flankoj gajnas”*.[16] Alie okazas ĉe la interŝanĝvaloro.

> „Viro, kiu posedas multe da vino kaj neniom da greno, komercas kun viro kiu posedas multe da greno kaj neniom da vino, kaj inter ili interŝanĝiĝas tritiko je valoro de 50 kontraŭ valoro de 50 en vino. Tiu interŝanĝo ne estas pliigo de la interŝanĝvaloro, nek por la unua nek por la alia; ĉar jam antaŭ la interŝanĝo ĉiu el ili posedis valoron egalan al tiu kiun li akiris per tiu operacio.”[17]

Nenio ŝanĝiĝas ĉe tio, se la mono kiel cirkuladrimedo intervenas inter la varoj kaj se do la agoj de aĉeto kaj vendo disiĝas.[18] La valoro de la varoj estas prezentita en iliaj prezoj, antaŭ ol ili eniras la cirkuladon, ĝi estas do ties antaŭkondiĉo ne rezulto.[19]

Abstrakte rigardate, t.e. nekonsidere la cirkonstancojn kiuj ne devenas el la imanentaj leĝoj de la simpla varcirkulado, krom la anstataŭado de unu uzvaloro per alia, nenio okazas en ĝi ol metamorfozo, nura formŝanĝo de la varo. La sama valoro, t.e. la sama kvanto da konkretigita socia laboro, restas en la mano de la sama varposedanto en la formo unue de sia varo, poste de la mono en kiun ĝi transformiĝis, fine de la varo en kiun tiu mono retransformiĝis. Tiu formŝanĝo ne inkluzivas ŝanĝon de la valorgrando. Sed la sola ŝanĝo, kiun la valoro de la varo mem trairas en tiu procezo, limiĝas al ŝanĝo de ĝia monformo. Tiu ekzistas unue kiel prezo de la vendota varo, poste kiel monsumo, kiu tamen jam estis esprimita en la prezo, fine kiel la prezo de ekvivalenta varo. Tiu formŝanĝo per si mem ne inkludas ŝanĝon de la valorgrando, same kiel la ŝanĝo de kvinpunda bileto kontraŭ sovereigns, duonaj sovereigns kaj ŝilingoj.

Do, sub la kondiĉo ke la cirkulado de la varo kaŭzas nur formŝanĝon de

16 „Léchange est une transaction admirable <admirinda transakcio> dans laquelle les deux contractants gagnent – toujours <ĉiam>(!).” (Destutt de Tracy, „Traité de la Volonté et de ses effets”, Parizo, 1826, p. 68) La sama libro aperis ankaŭ kiel „Traité d'Éc. Pol.”

17 Mercier de la Rivière, l.c., p. 544.

18 „Ĉu unu el tiuj du valoroj estas mono aŭ ĉu ambaŭ estas ordinaraj varoj, nenio povas esti pli indiferenta.” (Mercier de la Rivière, l.c., p. 543)

19 „Pri la valoro ne decidas la interkonsentantaj partneroj: ĝi estas klara jam antaŭ la interkonsento.” (Le Trosne, l.c., p. 906)

ĝia valoro, ĝi kaŭzas, se la fenomeno okazas pure, interŝanĝon de ekvivalentoj. Eĉ la vulgarekonomio, kvankam ĝi tute ne scias kio la valoro estas, ĝi supozas ĉiam, kiam ĝi siamaniere volas esplori la fenomenon en ĝia pureco, ke postulo kaj propono troviĝas en ekvilibro, t.e. ke ilia efiko sur la valoro estas nula. Se do koncerne la uzvaloron ambaŭ interŝanĝantoj povas gajni, ili ne povas ambaŭ gajni je interŝanĝvaloro. Pri tio aplikiĝas, male, la diro: *„Kie estas sameco, tie ne estas profito"*.[20] Varoj ja vendeblas je prezoj kiuj diferencas de siaj valoroj, sed tiu diferenco aperas kiel rompo de la leĝo de varinterŝanĝo.[21] En sia pura formo ĝi estas interŝanĝo de ekvivalentoj, do ne rimedo riĉiĝi je valoro.[22]

La provojn prezenti la varcirkuladon kiel fonton de plusvaloro kaŭzas do plej ofte konfuzo, konfuzo de uzvaloro kaj interŝanĝvaloro. Tiel ekz-e ĉe Condillac:

> „Estas malĝuste ke en la varinterŝanĝo oni interŝanĝas saman valoron kontraŭ sama valoro. Male. Ĉiu el la du kontraktantoj donas ĉiam pli malgrandan por pli grandan valoron … Se oni efektive interŝanĝus ĉiam samajn valorojn, tiam ne fareblus gajno por iu el la kontraktantoj. Sed ambaŭ gajnas aŭ almenaŭ devus gajni. Kial? La valoro de la aĵoj konsistas nur en ilia rilato al niaj bezonoj. Kio estas por la unua pli, tio estas por la alia malpli, kaj inverse … Oni ne atendas ke ni proponu por vendo aĵojn necesajn por nia konsumado … Ni volas fordoni aĵon por ni senutilan, por ricevi iun por ni necesan; ni volas doni malpli por pli … Estis nature juĝi ke oni en la interŝanĝo donas saman valoron por sama valoro, ĉiam kiam la valoro de ĉiu el la interŝanĝataj aĵoj egalis al la sama kvanto da mono … Sed alia konsidero devas eniri en la kalkulon; nome scii ĉu ni ambaŭ interŝanĝas abundon kontraŭ io necesa."[23]

Oni vidas kiel Condillac ne nur konfuzas uzvaloron kaj interŝanĝvaloron, sed li krome supozas kun infana simpleco staton en kiu la produktanto produktas mem siajn vivrimedojn kaj metas en la cirkuladon nur la krom-

---

20 „Dove è egualità non è lucro." (Galiani, „Della Moneta", en: Custodi, Parte Moderna, vol. IV, p. 244)

21 „La interŝanĝo fariĝas por unu el la du partioj malavantaĝa, se ia fremda cirkonstanco malaltigas aŭ altigas la prezon: tiam la egaleco estas rompita; sed tiu rompo estas kaŭzita de tiu cirkonstanco kaj ne de la interŝanĝo." (Le Trosne, l.c., p. 904)

22 „La interŝanĝo estas laŭ sia naturo kontrakto bazita sur egaleco, t.e. kiu okazas inter du samaj valoroj. Do ĝi ne estas rimedo riĉiĝi, ĉar oni donas tiom kiom oni ricevas." (Le Trosne, l.c., p. 903, 904)

23 Condillac, „Le Commerce et le Gouvernement" (1776), Édit. Daire et Molinari en la „Mélanges d'Économie Politique", Parizo, 1847, p. 267, 291)

aĵon super la propra bezono, la abundon.[24] Modernaj ekonomikistoj tamen tre ofte ripetas la argumenton de Condillac, precipe kiam ili volas prezenti la formon de la varinterŝanĝo, la komercon, kiel produktanton de plusvaloro.

> „La komerco”, oni diras ekz-e, „aldonas valoron al la produktoj, ĉar la samaj produktoj havas pli da valoro en la manoj de la konsumantoj ol en la manoj de la produktinto, kaj ĝi estas do konsiderenda laŭvorte (strictly) kiel produkta ago.”[25]

Sed oni ne pagas la varojn duoble, unufoje ilian uzvaloron kaj la alian fojon ilian valoron. Kaj se la uzvaloro de la varo estas pli utila al la aĉetanto ol al la vendanto, ĝia monformo estas pli utila al la vendanto ol al la aĉetanto. Ĉu alie li vendus ĝin? Kaj samrajte oni povus diri ke la aĉetanto laŭvorte (strictly) plenumas *„produktan agon”* per tio ke li transformas ekz-e la ŝtrumpojn de la komercisto en monon.

Kiam varoj aŭ varoj kaj mono de sama interŝanĝvaloro, do ekvivalentoj interŝanĝiĝas, tiam evidente neniu eltiras pli da valoro el la cirkulado ol li metas en ĝin. Tiam ne okazas estiĝo de plusvaloro. En sia pura formo la cirkuladprocezo konsistas el interŝanĝo de ekvivalentoj. Sed en la realo la aferoj ne okazas pure. Ni supozu do interŝanĝon de neekvivalentoj.

Ĉiukaze sur la varmerkato ekzistas nur varposedanto fronte al la varposedanto, kaj la povo, kiun tiuj personoj efikas al si reciproke, estas nur la povo de iliaj varoj. La materia malsameco de la varoj estas la materia motivo de la interŝanĝo kaj dependigas la varposedantojn reciproke unu de la alia, per tio ke neniu el ili tenas la objekton de sia propra bezono kaj ĉiu la objekton de la bezono de la alia en sia mano. Ekster tiu materia malsameco de la uzvaloroj ekzistas nur malsameco de la varoj, la malsameco inter ilia natura formo kaj ilia transformita formo, inter varo kaj mono. Kaj tiel la varposedantoj distingiĝas nur kiel vendanto, posedanto de varo, kaj aĉetanto, posedanto de mono.

Ni supozu nun, ke per ia neklarigebla privilegio la vendanto povas

24 Le Trosne pro tio respondas tre prave al sia amiko Condillac: „En la evoluinta socio absolute ne ekzistas io superflua.” Samtempe li incitetas lin per la rimarko ke, „se ambaŭ interŝanĝantoj ricevas same multan plion por same multan malplion, ili ricevas ambaŭ same multan”. Ĉar Condillac ankoraŭ ne havas la plej etan ideon pri la naturo de la interŝanĝvaloro, s-ro Prof. Wilhelm Roscher prenis lin kiel patronon por siaj propraj infanecaj nocioj. Vidu ties „Die Grundlagen der Nationalökonomie”, Dritte Auflage, 1858.

25 S. P. Newman, „Elements of Polit. Econ.”, Andover kaj Novjorko, 1835, p. 175.

vendi la varon super ties valoro, je 110, se ĝi valoras 100, do je nominala prezaltigo de 10 %. La vendanto enkasigas do plusvaloron de 10. Sed post kiam li estis vendanto, li fariĝas aĉetanto. Tria varposedanto renkontas lin nun kiel vendanto kaj ĝuas siaflanke la privilegion vendi la varon 10 elcente tro multekoste. Nia homo gajnis kiel vendanto 10, por kiel aĉetanto perdi 10.[26] La fina rezulto de ĉio ĉi estas, ke ĉiuj varposedantoj vendas al si reciproke siajn varojn 10-elcente super iliaj valoroj, kio estas ja tute same kvazaŭ ili vendus la varojn je ties valoroj. Tia ĝenerala nominala prezaltigo de la varoj faras la saman efikon kvazaŭ la varvaloroj estus taksataj ekz-e per arĝento anstataŭ per oro. La monnomoj, t.e. la prezoj de la varoj, ŝvelus, sed iliaj valorrilatoj restus senŝanĝaj.

Ni supozu inverse, ke estus la privilegio de la aĉetanto aĉeti la varojn sub ties valoro. Ĉi tie eĉ ne necesas memorigi ke la aĉetanto fariĝos vendanto. Li estis vendanto antaŭ ol fariĝi aĉetanto. Li perdis jam 10 % kiel vendanto antaŭ ol gajni 10 % kiel aĉetanto.[27] Kaj ĉio restas en la sama stato.

La estigo de plusvaloro, kaj do la transformado de mono en kapitalon, do klarigeblas nek per tio ke la vendantoj vendas la varojn super ties valoro, nek per tio ke la aĉetantoj aĉetas ilin sub ilia valoro.[28]

La problemo neniel simpliĝas se oni enŝovas fremdajn konsiderojn, ekzemple se oni diras kun Torrens:

> „La efektiva postulo konsistas en la kapablo kaj la emo (!) de la konsumantoj, ĉu per rekta kaj perata interŝanĝo, doni por varoj certan pli grandan porcion de ĉiuj ingrediencoj de la kapitalo ol ilia produktado kostas."[29]

En la cirkulado, produktantoj kaj konsumantoj prezentiĝas unu al la alia nur kiel vendantoj kaj aĉetantoj. Aserti, ke la plusvaloro por la pro-

26 „Per altigo de la nominala valoro de la produkto … la vendistoj ne fariĝas pli riĉaj … ĉar ili precize tion, kion ili gajnis kiel vendanto, en sia eco de aĉetanto ree elspezas." ([J. Gray] „The Essential Principles of the Wealth of Nations etc.", Londono, 1797, p. 66.)

27 „Se por 18 livres oni devas vendi certan kvanton de iu produkto kiu valoras 24 livres, tiam oni ricevos, se oni uzas la saman monsumon por aĉeto, por 18 libres ankaŭ tiom kiom por 24 livres." (Le Trosne, l.c., p. 897)

28 „Neniu vendanto povas do kutime altigi la prezon de siaj varoj sen devi same pagi la varojn de la aliaj vendantoj pli multekoste; kaj pro la sama kialo neniu konsumanto povas kutime aĉeti pli malmultekoste sen ankaŭ malaltigi la prezon de la varoj kiujn li vendas." (Mercier de la Rivière, l.c., p. 555)

29 R. Torrens, „An Essay on the Production of Wealth", Londono, 1821, p. 349

duktanto fontas el tio ke la konsumantoj pagas la varon super la valoro, signifas nur maski la simplan frazon: La varposedanto posedas kiel vendanto la privilegion vendi tro altpreze. La vendanto produktis la varon mem aŭ reprezentas ĝian produktinton, sed la aĉetanto ne malpli produktis mem la varon prezentatan en lia mono aŭ reprezentas ĝian produktinton. Do, produktanto prezentiĝas al produktanto. Tio, kio distingas ilin, estas, ke unu aĉetas kaj la alia vendas. Ke la varproduktanto sub la nomo produktanto vendas la varon super ĝia valoro kaj sub la nomo konsumanto pagas ĝin tro multekoste, tio helpas nin eĉe ne unu paŝon antaŭen.[30]

La konsekvencaj defendantoj de tiu iluzio, ke la plusvaloro fontas el nominala prezaltigo aŭ el la privilegio de la vendanto vendi la varon tro multekoste, supozas do klason kiu nur aĉetas sen vendi, do ankaŭ nur konsumas sen produkti. La ekzistado de tia klaso estas de nia ĝis nun atingita starpunkto, tiu de la simpla cirkulado, ankoraŭ ne komprenebla. Sed ni anticipu. La mono, per kiu tia klaso konstante aĉetas, devas al ĝi konstante realflui, sen interŝanĝo, senpage, laŭ iaj juraj aŭ perfortaj rajtoj. Vendi al tia klaso varojn super la valoro, signifas nur, senkompense fordonitan monon parte reakiri per trompo.[31] Tiel la malgrandaziaj urboj pagis jaran montributon al la antikva Romo. Per tiu mono Romo aĉetis varojn de ili kaj aĉetis ilin tro multekoste. La malgrandazianoj trompis la romanojn, per tio ke ili elruzis de ili parton de la tributo per la komerco. Sed tamen la malgrandazianoj restis fine la malavantaĝe traktitaj. Iliaj varoj estis, poste kiel antaŭe, pagataj al ili per ilia propra mono. Tio ne estas metodo de riĉiĝo aŭ de estigo de plusvaloro.

Ni devas do resti ene de la limoj de la varinterŝanĝo, kie vendantoj estas aĉetantoj kaj aĉetantoj vendantoj. Nia embaraso okazas eble pro tio ke ni traktis la personojn nur kiel personigitajn kategoriojn, ne individue.

Ni supozu ke la varposedanto A estas tiom ruza ke li trompas siajn kolegojn B aŭ C, dum tiuj, malgraŭ la plej bona volo, ne kapablas venĝi sin. A vendas vinon je la valoro de 40 sterlingaj pundoj al B kaj akiras

30 „La penso, ke la profitoj estas pagataj de la konsumantoj, estas certe komplete absurda. Kiuj estas la konsumantoj?” (G. Ramsay, „An Essay on the Distribution of Wealth”, Edinburgo, 1836, p. 183)

31 „Se iu ne havas sufiĉe da postulo, ĉu tiam s-ro Malthus konsilas al li pagi alian personon por ke tiu akiru de li la varojn?” demandas indignita Ricardo-ano Malthus-on kiu, kiel lia disĉiplo, la pastro Chalmers, ekonomike gloras la klason de nuraj aĉetantoj aŭ konsumantoj. Vidu: „An Inquiry into those principles, respecting the Nature of Demand and the Necessity of Consumption, lately advocated by Mr. Malthus etc.”, Londono, 1821, p. 55.

interŝanĝe grenon je valoro de 50 sterlingaj pundoj. A transformis siajn 40 sterlingajn pundojn en 50 sterlingajn pundojn, faris pli da mono el malpli da mono kaj transformis sian varon en kapitalon. Ni rigardu pli precize. Antaŭ la interŝanĝo ni havis vinon en la valoro de 40 sterlingaj pundoj en la mano de A kaj grenon en la valoro de 50 sterlingaj pundoj en la mano de B, ĉiomvaloro de 90 sterlingaj pundoj. Post la interŝanĝo ni havas la saman ĉiomvaloron de 90 sterlingaj pundoj. La cirkulanta valoro grandiĝis eĉ ne per unu atomo, ĝia disdivido inter A kaj B ŝanĝiĝis. Ĉe unu flanko aperas kiel plusvaloro, kio ĉe la alia flanko estas minusvaloro, ĉe unu flanko kiel pluso tio, kio ĉe la alia flanko kiel minuso. La sama ŝanĝo okazintus, se A, sen la maskanta formo de interŝanĝo, rekte ŝtelintus al B 10 sterlingajn pundojn. La sumo de la cirkulantaj valoroj evidente ne pligrandigeblas per ia ŝanĝo de la disdivido, same kiel judo ne povas pliigi la kvanton de noblaj metaloj en iu lando per tio ke li vendas unu kvaronpencon[32] el la epoko de la reĝino Anna por unu gvineo. La tutaĵo de la kapitalista klaso de iu lando ne povas superruzi sin mem.[33]

Oni povas do turni sin kiel oni volas, la konkludo restas la sama. Se interŝanĝiĝas ekvivalentoj, tiam ne estiĝas plusvaloro, kaj se interŝanĝiĝas neekvivalentoj, ankaŭ tiam ne estiĝas plusvaloro.[34] La cirkulado aŭ var-interŝanĝo ne kreas valoron.[35]

Oni komprenas do, kial en nia analizo de la baza formo de la kapitalo, la formo, en kiu ĝi determinas la ekonomian organizon de la moderna

32 Originale en la angla: Farthing. -vl

33 Destutt de Tracy, kvankam – eble ĉar – Membre de l'Institut, havis inversan opinion. La industriaj kapitalistoj, diras li, faras siajn profitojn per tio ke „ili vendas ĉion pli multekoste ol kostis por produkti tion. Kaj al kiu ili vendas? Unue al si reciproke.” (l.c., p. 239.

34 „La interŝanĝo de du samaj valoroj nek pliigas la kvanton de la en la socio troviĝantaj valoroj nek malpliigas ĝin. La interŝanĝo de du malsamaj valoroj … ankaŭ ne ŝanĝas ion ajn en la sumo de la sociaj valoroj, kvankam ĝi aldonas al la havaĵo de unu persono tion kion ĝi forprenas el la havaĵo de la alia.” (J. B. Say, l.c., vol. II, p. 443, 444) Say, kompreneble ne zorgante pri la konsekvencoj de tiu frazo, depruntas ĝin laŭvorte el la fiziokratoj. La sekva ekzemplo montras kiel li ekspluatis iliajn verkojn liatempe ne alireblajn, por pliigi sian propran „valoron”. La „plej fama” frazo de s-ro Say, „Oni povas aĉeti produktojn nur per produktoj” (l.c., vol. II, p. 438), tekstas en la fiziokrata originalo: „Produktoj pageblas nur per produktoj.” (Le Trosne, l.c., p. 899)

35 „La interŝanĝo transdonas nenian valoron al la produktoj.” (F. Wayland, „The Elements of Pol. Econ.”, Bostono, 1843, p. 168)

socio, ni unue tute ne konsideris ĝiajn popularajn kaj por tiel diri antaŭdiluvajn formojn, la komercan kapitalon kaj la uzurkapitalon.

La formo m – vr – m', aĉeti por vendi pli multekoste, aperas plej pure en la aŭtenta komerca kapitalo. Aliflanke ĝia tuta moviĝo okazas ene de la cirkuladsfero. Sed ĉar maleblas klarigi per la cirkulado mem la transformadon de mono en kapitalon, la estigon de plusvaloro, tial la komerca kapitalo ŝajnas ne ebla ekde kiam interŝanĝiĝas ekvivalentoj.[36] Ĝi estas deduktebla nur el la duflanka tropostulado de la aĉetantaj kaj vendantaj varproduktantoj per la komercisto kiu parazite interŝoviĝas inter ili. Tiusence Franklin diras: *„Milito estas rabo, komerco estas trompo”*.[37] Se klarigi la plivalorigon de la komerca kapitalo alie ol per nura trompo de la varproduktantoj, necesas por tio longa vico de interaj partoj kiuj ĉi tie, kie ni pritraktas ekskluzive la varcirkuladon kaj ĝiajn simplajn elementojn, ankoraŭ tute mankas.

Kio estas dirita pri la komerca kapitalo, tio validas ankoraŭ pli pri la uzurkapitalo. En la komerca kapitalo la ekstremaĵoj – la mono ĵetita en la merkaton kaj la pliigita mono tirata el la merkato – estas almenaŭ perataj de aĉeto kaj vendo, de la moviĝo de cirkulado. En la uzurkapitalo la formo m – vr – m' estas mallongigita al la senperaj ekstremaĵoj m – m', mono, kiu interŝanĝiĝas per pli da mono, jen formo kiu kontraŭdiras la naturon de la mono kaj kiu estas do el la starpunkto de la varinterŝanĝo ne klarigebla. Pro tio diras Aristotelo:

> „Ĉar la ĥrematistiko estas duobla, unu apartenanta al la komerco, la alia al la ekonomio, la lasta necesa kaj laŭdinda, la unua bazita sur la cirkulado kaj prave mallaŭdata (ĉar ĝi ne baziĝas sur la naturo, sed sur reciproka trompado), tial la uzuro estas plenrajte malamata, ĉar la mono mem estas ĉi tie la fonto de la akiro kaj ne uzata al tio por kio ĝi estis inventita. Ĉar ĝi estiĝis por la varinterŝanĝo, sed la interezo faras el mono pli da mono. Pro tio ankaŭ ĝia nomo” (τόκος <greke: tokos> interezo kaj naskitaĵo). „Ĉar la naskitoj similas al la generintoj. Sed la interezo estas mono de mono, tiel ke el ĉiuj metiaj branĉoj tiu estas la plej kontraŭa al la naturo.”[38]

---

36 „Sub la regado de senŝanĝaj ekvivalentoj la komerco estus malebla.” (G. Opdyke, „A Treatise on polit. Economy”, Novjorko, 1851, p. 66 ĝis 69) „La diferenco inter reala valoro kaj la interŝanĝvaloro baziĝas sur la fakto, ke la valoro de aĵo estas malsama ol la pretendita ekvivalento kiun oni donas al ĝi en la komerco, kio signifas ke tiu ekvivalento ne estas ekvivalento.” (F. Engelso, l.c., p. 95, 96 <Vd Volumo 1, p. 508>)

37 Benjamin Franklin, „Works”, vol. II, eld. Sparks en „Positions to be examined concerning National Wealth” [p. 376].

38 Arist[oteles], l.c., c. 10 [p. 17].

Dum nia analizado ni trovos, ke la komerca kapitalo, la interezporta kapitalo estas derivitaj formoj kaj samtempe ni vidos kial ili aperis historie antaŭ la moderna baza formo de la kapitalo.

Ni montris ke la plusvaloro ne povas fonti el la cirkulado, ke ĉe ĝia estiĝo io devas okazi malantaŭ ĝia dorso, kio estas en la cirkulado mem nevidebla.[39] Sed ĉu la plusvaloro povas fonti ie alie ol en la cirkulado? La cirkulado estas la sumo de ĉiuj interrilatoj[40] de la varposedantoj. Ekstere de ĝi, la varposedanto estas jam nur en rilato al sia propra varo. Koncerne ties valoron, la rilato limiĝas al tio ke ĝi entenas kvanton de lia propra laboro mezurata laŭ certaj sociaj leĝoj. Tiu kvanto esprimiĝas en la valorgrando de lia varo, kaj, ĉar valorgrando prezentiĝas en kalkulmono, en prezo de ekz-e 10 sterlingaj pundoj. Sed lia laboro ne prezentiĝas en la valoro de la varo kaj kromaĵo super ĝia propra valoro, ne en prezo de 10 kiu estus samtempe prezo de 11, ne en valoro kiu estas pli granda ol ĝi mem. La varposedanto povas per sia laboro estigi valorojn, sed ne valorojn kiuj plivalorigas sin. Li povas altigi la valoron de varo per tio ke li aldonas al ekzistanta valoro novan valoron per nova laboro, ekz-e faras el ledo botojn. La sama materialo havas nun pli da valoro, ĉar ĝi entenas pli grandan laborkvanton. La boto havas pro tio pli grandan valoron ol la ledo, sed la valoro de la ledo restis kio ĝi estis. Ĝi ne plivalorigis sin, ne aldonis plusvaloron dum la botfabrikado. Maleblas do ke la varproduktanto ekster la cirkuladsfero, sen ekrilati kun aliaj varposedantoj, plivalorigas valorojn kaj do transformas monon aŭ varon en kapitalon.

Kapitalo do ne povas fonti el la cirkuladsfero, kaj ĝi samtempe ankaŭ ne povas ne fonti en la cirkulado. Ĝi devas samtempe fonti en ĝi kaj ne en ĝi.

Do, la rezulto estas duobla.

Oni devas klarigi la transformadon de mono en kapitalon surbaze de la imanentaj leĝoj de la varinterŝanĝo, tiel ke la interŝanĝo de ekvivalentoj estas la elirpunkto.[41] Nia ankoraŭ nur kiel kapitalist-pupo ekzistanta mon-

39 „Sub la kutimaj kondiĉoj de la merkato, profito ne fariĝas per interŝanĝo. Se ĝi ne ekzistus antaŭe, tiam ĝi povus ankaŭ ne ekzisti post tiu transakcio.” (Ramsey, l.c., p. 184)

40 *3-a kaj 4-a eldonoj:* varrilatoj.

41 Post la donita klarigo la leganto komprenas ke tio nur signifas: La kapitaligo devas esti ebla ankaŭ se la varprezo egalas la varvaloron. Ĝi ne klarigeblas el la diferenciĝo de la varprezoj disde la varvaloroj. Se la prezoj reale diferenciĝas de la valoroj, tiam oni devas unue redukti ilin al la lastaj, t.e. malkon-

posedanto devas aĉeti la varojn laŭ ilia valoro, vendi ilin laŭ ilia valoro, kaj tamen ĉe la fino de la procezo eltiri pli da valoro ol li estis enmetinta. Lia elpupiĝo kiel kapitalisto devas okazi en la cirkuladsfero kaj devas okazi ne en la cirkuladsfero. Jen la kondiĉoj de la problemo. Jen Rodiso, jen saltu![42]

# 3. Aĉeto kaj vendo de la laborforto

La valorŝanĝo de la mono kiu estas kapitaliĝonta, ne povas okazi ĉe tiu mono mem, ĉar kiel aĉetrimedo kaj kiel pagrimedo ĝi realigas nur la prezon de la varo kiun ĝi aĉetas aŭ pagas, dum ĝi, restanta en sia propra formo, rigidiĝas al fosilio de konstanta valorgrando.[43] Ankaŭ el la dua cirkulad-ago, la revendo de la varo, la ŝanĝiĝo ne povas fonti, ĉar tiu ago transformas la varon nur el la naturformo reen en la monformon. La ŝanĝiĝo devas do okazi ĉe la varo kiu estas aĉetata en la unua ago m – v, sed ne ĉe ĝia valoro, ĉar tio, kio interŝanĝiĝas, estas ekvivalentoj, la varo estas pagata je sia valoro. Por eltiri valoron el la uzado de varo, nia monposedanto devus esti tiom bonŝanca malkovri ene de la cirkuladsfero, sur la merkato, varon, kies uzvaloro mem havas la apartan econ esti fonto de valoro, kies reala uzado estus do mem konkretigo de laboro, pro tio valorkreado. Kaj la monposedanto trovas sur la merkato tian specifan

---

sideri tiun cirkonstancon kiel hazardan, por havi antaŭ si la fenomenon de kapitaligo surbaze de la varinterŝanĝo en sia pura formo kaj ne esti konfuzita en sia observado per ĝenaj flankaj cirkonstancoj fremdaj al la fenomeno mem. Oni scias cetere ke tiu reduktado tute ne estas nur scienca procedo. La konstantaj osciladoj de la merkatprezoj, ilia altiĝo kaj falo, kompensiĝas, reciproke nuligas sin kaj reduktas sin mem al la mezuma prezo, kio estas ilia interna regulilo. Tiu konsistigas la gvidilon ekz-e de la komercisto aŭ de la industriisto en ĉiu entrepreno kiu daŭras iom da tempo. Li ja scias ke, se oni konsideras iom pli longan periodon, la varoj vendiĝas en realo nek sub nek super, sed je sia mezuma prezo. Do, se li volus analizi la aferon objektive, li devus starigi al si la problemon de kapitaligo jene: Kiel kapitalo povas estiĝi ĉe regulado de la prezoj per la mezuma prezo, t.e. lastinstance per la valoro de la varo? Mi diras „lastinstance”, ĉar la mezuma prezo ne rekte kongruas kun la valorgrandoj de la varoj, kiel A. Smith, Ricardo ktp kredas.

42 *Originale latine: Hic Rhodos, hic salta!* (laŭvorte: *Ĉi tie estas Rodiso, ĉi tie saltu!*) Antikva historio rakontas ke iu fanfaronis ke li povas salti tre alten kaj, al la peto montri tion, li respondis, ke li povas fari tion hejme, en Rodiso. Tiam oni respondis al li: *Jen Rodiso, jen saltu!* -vl

43 „En la formo de mono … la kapitalo ne generas profiton.” (Ricardo, „Princ. of Pol. Econ.”, p. 267)

varon – la laborkapablon aŭ la laborforton.

Sub laborforto aŭ laborkapablo ni komprenas la tutaĵon de la korpaj kaj mensaj kapabloj kiuj ekzistas en la korpeco, en la vivanta personeco de homo, kaj kiujn li movas ekde kiam li produktas iajn ajn uzvalorojn.

Sed por ke la monposedanto trovu la laborforton sur la merkato, diversaj kondiĉoj devas esti plenumitaj. La varinterŝanĝo en si mem ne inkludas aliajn dependecrilatojn ol tiujn kiuj fontas el ĝia propra naturo. Sub tiu kondiĉo la laborforto kiel varo povas aperi sur la merkato, se kaj ĉar ĝi estas de sia posedanto, la persono, kies laborforto ĝi estas, ofertata kiel varo por vendo. Por ke ĝia posedanto vendu ĝin kiel varon, li devas disponi pri ĝi, do esti libera proprietulo de sia laborkapablo, de sia persono.[44] Li kaj la monposedanto renkontiĝas sur la merkato kaj ekrilatas kiel egalrangaj varposedantoj, distingeblaj nur per tio ke la unua estas aĉetanto, la alia vendanto, do jure samaj personoj. La daŭro de tiu rilato necesigas ke la posedanto de la laborforto vendu tiun ĉiam nur por certa tempo, ĉar se li vendas ĝin entute, unu fojon por ĉiam, tiam li vendas sin mem, transformas sin el liberulo en sklavon, el varposedanto en varon. Li kiel persono devas konstante trakti sian laborforton kiel sian proprieton kaj pro tio sian propran varon, kaj tion li povas fari nur se li disponigas ĝin al la aĉetanto ĉiam nur provizore, por difinita daŭro, lasas al li por uzado, do per la vendo ne rezignas pri sia proprieto je ĝi.[45]

44 En la enciklopedioj pri la klasika epoko legeblas la sensencaĵo ke en la antikva mondo la kapitalo estis komplete evoluinta, „escepte ke la libera laboristo kaj la kredito mankis”. Ankaŭ s-ro Mommsen en sia „Römische Geschichte” [Historio de Romo] faras unu konfuzon post la alia.

45 Diversaj leĝdonantoj fiksas do minimumon por la laborkontrakto. Ĉiuj leĝaroj ĉe popoloj de libera laboro reguligas kondiĉojn de maldungo de la kontrakto. En diversaj landoj, nome en Meksiko (antaŭ la usona interna milito ankaŭ en la teritorioj detranĉitaj for de Meksiko, kaj laŭ la fakto en la Danubaj provincoj ĝis la revolucio de Kusas), la sklaveco estas kaŝita sub la formo de peonismo. Per antaŭpagoj, repageblaj per laboro kaj kiuj herediĝas de generacio al generacio, ne nur la individua laboristo, sed lia tuta familio fariĝas fakte la proprieto de aliaj personoj kaj de ties familioj. Juárez nuligis la peonismon. La tiel nomata imperiisto Maksimiliano reenkondukis ĝin per dekreto, kiu estis en la parlamento en Vaŝingtono trafe karakterizita kiel dekreto por reenkonduko de sklavismo en Meksiko. „Mi povas disponigi al iu alia, por limigita tempo, la uzadon de miaj apartaj korpaj kaj intelektaj lertecoj kaj agadeblecoj, ĉar kun tiu limigo ili ricevas eksteran rilaton al mia totaleco kaj ĝeneraleco. Per tiu fremdigo de mia tuta labortempo kaj de mia tuta produktado mi farus la substancon, mian ĝeneralan agadon kaj realon, mian personon

La dua esenca kondiĉo por ke la monposedanto trovu la laborforton sur la merkato kiel varon, estas tiu ke ĝia posedanto, anstataŭ povi vendi varojn, per kiuj lia laboro konkretiĝis, devas oferti al vendo sian laborforton mem, kiu ekzistas nur en lia vivanta korpeco, estiel varon.

Por ke iu vendu varojn aliajn ol sian laborforton, li devas kompreneble posedi produktadrimedojn, ekz-e krudmaterialojn, laborilojn ktp. Li ne povas fari botojn sen ledo. Li bezonas krome vivrimedojn. Neniu, eĉ ne estonta muzikisto, povas manĝi estontajn produktojn, do ankaŭ ne uzvalorojn kies produktado estas ankoraŭ ne preta, kaj, kiel en la unua tago de sia apero sur la terscenejo, la homo devas ĉiutage konsumi, antaŭ kaj dum li produktas. Se la produktoj estas produktataj kiel varoj, tiam ili vendendas post esti produktitaj, kaj povas kontentigi la bezonojn de la produktanto nur post la vendo. Al la tempo por produktado aldoniĝas la tempo necesa por vendo.

Por transformo de mono en kapitalon, la monposedanto devas do renkonti la liberan laboriston sur la varmerkato, liberan en la duobla senco, ke li disponas kiel libera persono pri sia laborforto estiel sia varo, ke li aliflanke ne havas aliajn varojn por vendi, ke li estas sena, libera, de ĉiuj aĵoj necesaj por realigi sian laborforton.

La demando, kial tiu libera laboristo alpaŝas lin en la cirkuladsfero, ne interesas la monposedanton, kiu trovas la labormerkaton kiel apartan fakon de la varmerkato. Kaj provizore ĝi ankaŭ ne interesas nin. Ni retenas la fakton teorie, kiel la monposedanto fakte. Sed unu afero klaras. La naturo ne produktas ĉe unu flanko mon- aŭ var-posedantojn kaj ĉe la alia posedantojn nur de siaj propraj laborfortoj. Tiu rilato ne havas naturhistorian bazon kaj same ne socian bazon komunan al ĉiuj historiaj periodoj. Ĝi estas evidente mem la rezulto de antaŭa historia evoluo, la produkto de multaj ekonomiaj revolucioj, de la pereo de tuta serio da pli malnovaj formoj de socia produktado.

Ankaŭ la ekonomiaj kategorioj, kiujn ni antaŭe rigardis, portas sian historian spuron. En la esto de la produkto kiel varo kaŝiĝas certaj historiaj kondiĉoj. Por fariĝi varo, la produkto devas ne esti produktata kiel rekta vivrimedo por la produktanto mem. Se ni esplorintus pli, sub kiaj kondiĉoj ĉiuj aŭ eĉ nur la pliparto de la produktoj alprenas la formon de varo, tiam ni trovintus ke tio okazas nur surbaze de tute specifa produktadmaniero, de la kapitalisma. Sed tia esplorado estus tute ekster la analizo

proprieto de iu alia.” (Hegelo, „Philosophie des Rechts”, Berlino, 1840, p. 104, § 67)

de la varo. Varproduktado kaj varcirkulado povas okazi, eĉ kiam la ege plej granda kvanto de produktoj, direktita rekte al la membezono, ne transformiĝas en varon, kiam do la socia produktadprocezo ankoraŭ tute ne estas dominata en sia tuta larĝeco kaj profundeco de la interŝanĝ-valoro. La prezentiĝo de la produkto kiel varo antaŭkondiĉas tiom evoluintan labordividon ene de la socio, ke la distingo inter uzvaloro kaj interŝanĝvaloro, kiu en la rekta interŝanĝkomerco nur komenciĝas, jam estas plenumita. Sed tia evoluŝtupo estas komuna al la historie plej diversaj ekonomiaj sociordoj.

Aliflanke, se ni rigardas la monon, ni vidas ke tiu antaŭkondiĉas certan altecon de la varinterŝanĝo. La apartaj monformoj, nur varekvivalento aŭ cirkuladrimedo, trezoro aŭ mondmono, rivelas, respektive laŭ la diversa amplekso kaj la relativa dominado de unu aŭ alia funkcio, tre diversajn ŝtupojn de la socia produktadprocezo. Tamen laŭsperte sufiĉas relative malforte evoluinta varcirkulado por estigo de ĉiuj ĉi formoj. Alie statas pri la kapitalo. Ĝiaj historiaj ekzistadkondiĉoj tute ne ekzistas kun la var- kaj mon-cirkulado. Ĝi estiĝas nur kie la posedanto de produktad- kaj viv-rimedoj renkontas la liberan laboriston kiel vendanton de sia laborforto sur la merkato, kaj tiu sola historia kondiĉo entenas mondhistorion. La kapitalo anoncas do dekomence epokon de socia produktadprocezo.[46]

Tiu aparta varo, la laborforto, estas nun pli detale esplorenda. Same kiel ĉiuj aliaj varoj ĝi posedas valoron.[47] Kiel ĝi determiniĝas?

La valoro de la laborforto, same kiel tiu de ĉiu alia varo, estas determinata de la labortempo necesa por la produktado, do ankaŭ reprodukt-ado, de tiu specifa artiklo. En tio ke ĝi havas valoron, la laborforto mem reprezentas nur certan kvanton da en ĝi konkretigita socia mezuma laboro. La laborforto ekzistas nur kiel kapableco de la vivanta individuo. Ĝia produktado do antaŭkondiĉas ties ekzistadon. Se la ekzistado de la individuo estas donita, la produktado de la laborforto konsistas en lia propra reproduktado aŭ konserviĝo. Por sia konserviĝo la vivanta individuo bezonas certan sumon da vivrimedoj. La labortempo necesa por la produktado de la laborforto egalas do al la labortempo necesa por la

46 Tio, kio do karakterizas la kapitalisman epokon, estas, ke la laborforto por la laboristo mem ricevas la formon de varo al li apartenantan, lia laboro pro tio la formon de dunglaboro. Aliflanke, nur ekde tiu momento la varformo de la laborproduktoj ĝeneraliĝas.

47 „La valoro de homo estas kiel tiu de ĉiuj aliaj aĵoj egala al sia prezo: tio signifas, tiom, kiom oni pagas por la uzado de lia forto.” (Th. Hobbes, „Leviathan”, en: „Works”, eld. Molesworth, Londono, 1839-1844, vol. III, p. 76.)

produktado de tiuj vivrimedoj; [per aliaj vortoj, la valoro de la laborforto estas la valoro de la vivrimedoj necesaj por la konservado de la laboristo][48]. Sed la laborforto realiĝas nur per sia esprimiĝo, agas nur en la laboro. Sed per ĝia funkciigo, la laboro, elpeziĝas certa kvanto da homa muskolo, nervo, cerbo ktp, kaj tiu estas kompensenda. Ju pli la elspezo grandas, des pli ĝi estas kompensenda.[49] Se la proprietulo de la laborforto laboris hodiaŭ, li devas morgaŭ povi ripeti la saman procezon sub la samaj kondiĉoj. La sumo de la vivrimedoj devas do sufiĉi por konservi la laborantan individuon kiel laborantan individuon en lia normala vivstato. La naturaj bezonoj mem, kiel nutraĵo, vestaĵoj, hejtado, loĝado ktp, estas diversaj laŭ la klimataj kaj aliaj naturaj apartecoj de lando. Aliflanke la amplekso de tiel nomataj necesaj bezonoj, same kiel la maniero de ilia kontentigo, estas mem historia produkto kaj dependas do grandparte de la kulturŝtupo de lando, interalie ankaŭ esence de la kondiĉoj – kaj sekve de la kutimoj kaj vivpretendoj – sub kiuj la klaso de la liberaj laboristoj formiĝis.[50] Male al la aliaj varoj, la valordeterminado de la laborforto entenas historian kaj moralan elementon. Sed por donita lando, je donita periodo, la mezuma kvanto kaj speco de necesaj vivrimedoj estas ankaŭ donita.

La proprietulo de laborforto estas mortideva. Do, se lia apero sur la merkato estu daŭra – kion necesigas la daŭra transformado de mono en kapitalon –, tiam la vendisto de sia laboforto devas eterniĝi, „kiel ĉiu vivanta individuo eterniĝas, per reprodukiĝo”.[51] La laborfortoj malaperintaj el la merkato pro eluziĝo aŭ morto estas konstante kompensendaj almenaŭ per sama kvanto da novaj laborfortoj. La sumo de la vivrimedoj necesaj por la produktado de la laborforto entenas do la vivrimedojn de la anstataŭontoj, t.e. de la laboristidoj, tiel ke tiu raso de apartaj varposedantoj eterniĝu sur la varmerkato.[52]

48 La teksto inter rektaj krampoj kongruas kun la franca kaj angla eldonoj. -vl

49 La romia *vilicus*, kiel mastrumanto ĉe la pinto de la terkulturaj sklavoj, ricevis do, „ĉar li havas pli facilan laboron ol la servistoj, pli malgrandan porcion ol tiuj”. (Th. Mommsen, „Römische Geschichte”, 1856, p. 810)

50 Kp „Over-Population and its Remedy”, Londono, 1846, de W. Th. Thornton.

51 Petty.

52 „Ĝia” (de la laboro) „natura prezo … konsistas en tia kvanto da vivrimedoj kaj aĵoj de komforto, kiom necesas laŭ la klimato kaj la kutimoj de lando, por konservi la laboriston kaj por ebligi al li elkreskigi familion, kiu kapablu certigi sur la merkato nereduktitan proponon de laboro.” (R. Torrens, „An Essay on the external Corn Trade”, Londono, 1815, p. 62). La vorto laboro staras ĉi tie malĝuste por laborforto.

Por modifi la ĝenerale homan naturon tiel ke ĝi akiru lertecon, precizecon kaj rapidecon en donita industribranĉo, ke ĝi fariĝu disvolvita kaj specifa laborforto, necesas certa formado aŭ edukado, kiu siavice kostas pli aŭ malpli grandan sumon da varekvivalentoj. Laŭ la pli aŭ malpli granda kompleksec o de la laborforto ĝiaj formadkostoj estas diversaj. Tiuj lernadkostoj, cetere tre etaj por la simpla laborforto, eniras do en la sumon de la valoroj elspezataj por ĝia reproduktado.

La valoro de la laborforto egalas al la valoro de certa sumo da vivrimedoj. Pro tio ĝi ŝanĝiĝas ankaŭ kun la valoro de tiuj vivrimedoj, t.e. de la grando de la labortempo necesa por ilia produktado.

Parto de la vivrimedoj, ekz-e nutraĵoj, hejtiloj ktp, ĉiutage denove konsumiĝas kaj ĉiutage denove anstataŭigendas. Aliaj vivrimedoj, kiel vestaĵoj, mebloj ktp, konsumiĝas en pli longa tempo kaj anstataŭigendas do nur en pli longaj tempospacoj. Varoj de unu speco aĉetendas kaj pagendas ĉiutage, aliaj ĉiusemajne, kvaronjare ktp. Sed kiel ajn la sumo de tiuj elspezoj dividiĝas ekz-e dum jaro, ĝi devas esti kovrita per la ĉiutagaj mezumaj enspezoj. Se la kvanto de la varoj ĉiutage necesaj por la produktado de la laborforto = A, tiu de la ĉiusemajne necesaj = B, tiu de la kvaronjare necesa = C ktp, tiam la ĉiutaga mezumo de tiuj varoj estus = $^{265A + 52 B + 4C + ktp}/_{365}$. Ni supozu ke tiu varkvanto necesa por la mezuma tago entenas ses horojn da socia laboro, tiam en la laborforto konkretiĝas ĉiutage duona tago da socia mezuma laboro, alivorte, duona labortago necesas por la ĉiutaga produktado de la laborforto. Tiu laborkvanto necesa por ĝia ĉiutaga produktado estas la taga valoro de la laborforto, aŭ la valoro de la ĉiutage reproduktata laborforto. Se duona tago da socia mezumlaboro prezentiĝas ankaŭ en orkvanto de 3 ŝilingoj aŭ unu talero, tiam unu talero estas la prezo kiu kongruas kun la interŝanĝvaloro de la laborforto. Se la posedanto de la laborforto ofertas ĝin por unu talero tage, tiam ĝia vendoprezo egalas al ĝia valoro kaj, laŭ nia hipotezo, la monposedanto, avida kapitaligi siajn talerojn, pagas tiun valoron.

La lasta limo aŭ minimuma limo de la valoro de la laborforto estas la valoro de varkvanto, sen kies ĉiutaga ricevo la portanto de la laborforto, la homo, ne povas renovigi sian vivprocezon. Ĝi estas do la valoro de la korpe nepraj vivrimedoj. Se la prezo de la laborforto falas al tiu minimumo, tiam ĝi falas sub ĝian valoron, ĉar la laborforto povas konservi kaj disvolvi sin nur en kripla formo. Sed la valoro de ĉiu varo determiniĝas per la labortempo necesa por liveri ĝin en normala kvalito.

Estas eksterordinare banala sentimentileco deklari tiun valordifinon de

la laborforto, metodon preskribitan de la naturo de la afero, kiel brutalan, kaj lamenti ekz-e kun Rossi:

> „Kompreni la laborkapablon (puissance de travail) kaj samtempe abstrakti la vivrimedojn de la laboristoj dum la produktadprocezo, signifas kompreni fantomon. Tiu, kiu diras *laboro*[53], kiu diras *laborkapablo*, diras samtempe *laboristoj* kaj *vivrimedoj*, *laboristo* kaj s*alajro*."[54]

Tiu, kiu diras *laborkapablo*, ne diras *laboro*, same kiel tiu, kiu diras *digestkapablo*, ne diras *digesto*. Por tiu lasta procezo necesas cetere pli ol bona stomako. Kiu diras *laborkapablo*, ne abstraktas la vivrimedojn necesajn por ĝia vivtenado. Ilia valoro estas jam esprimita en ĝia valoro. Se ĝi ne estas vendata, tiam ĝi ne utilas al la laboristo, tiam li sentas kiel kruelan naturneceson la fakton ke lia laborkapablo bezonis certan kvanton da vivrimedoj por ĝia produktado kaj ĉiam denove bezonas por ĝia reproduktado. Tiam li malkovras kun Sismondi: *„La laborkapablo … estas nenio, se ĝi ne estas vendata"*.[55]

La aparteco de tiu specifa varo, laborforto, faras ke per la subskribo de la kontrakto inter aĉetanto kaj vendanto ĝia uzvaloro ankoraŭ ne vere transiris en la manon de la aĉetanto. Ĝia valoro, same kiel tiu de ĉiu alia varo, estis determinita antaŭ ol ĝi eniris en la cirkuladon, ĉar certa kvanto da socia laboro estis elspezita por la produktado de la laborforto, sed ĝia uzvaloro konsistas maljam en la posta aplikado de la forto. Tiu fremdigo de la forto kaj ĝia vera esprimiĝo, t.e. ĝia esto kiel uzvaloro, do tempe disfalas. Sed ĉe tiaj varoj[56], kie inter la formala forcedo[57] de la uzvaloro per la vendo kaj ĝia fakta disponigo al la aĉetanto pasas tempo, la mono de la aĉetanto funkcias plej ofte kiel pagrimedo. En ĉiuj landoj de kapitalisma produktadmaniero la laborforto estas pagata nur post kiam ĝi jam funkciis dum la tempo interkontraktita en la vendokontrakto, ekz-e fine de ĉiu semajno. Do, ĉie la laboristo antaŭpagas al la kapitalisto la uzvaloron de la laborforto; li lasas la aĉetanton konsumi ĝin, antaŭ ol tiu

53 Ĉiuj kursivigoj sur tiu ĉi kaj la sekva paĝo estas de la tradukinto. -vl

54 Rossi: Cours d'Econ. Polit., Bruselo, 1842, p. 370.

55 Sismondi, „Nouv. Princ. ktp", vol. I, p. 113.

56 „Ĉia laboro estas pagata post kiam ĝi estas finita." (An Inquiry into those Principles, respecting the Nature of Demand etc.", p. 104) „La komercista kredito devis komenci en tiu momento en kiu la laboristo, la unua kreinto de la produktaĵo, surbaze de siaj ŝparaĵoj, kapablis atendi la salajron por sia laboro ĝis la fino de unu ĝis du semajnoj, monato, kvaronjaro ktp." (Ch. Ganilh, „Des Systèmes d'Écon. Polit.", 2ème édit., Parizo, 1821, vol. II, p. 150.)

57 *En la angla kaj franca versioj:* fremdigo. -vl

pagas ĝian prezon, do ĉie la laboristo estas kreditoro de la kapitalisto. Ke tiu kreditoreco ne estas pura inventaĵo, tion montras ne nur la okaza perdo de la kreditita salajro ĉe bankroto de la kapitalisto[58], sed ankaŭ serio de pli aŭ malpli daŭremaj postsekvoj.[59] Tamen, ĉu la mono servas kiel aĉetilo aŭ kiel pagilo, tio neniel ŝanĝas la naturon de la varinterŝanĝo mem. La prezo de la laborforto estas kontrakte fiksita, kvankam ĝi estas nur poste realigata, kiel la luprezo de domo. La laborforto estas vendita, kvankam ĝi estas pagata nur poste. Sed por la pura kompreno de la rilato utilas, provizore supozi ke la proprietulo de la laborforto ĉiufoje kun ties vendo

58 „La laboristo alpruntas sian diligenton", sed, ruze aldonas Storch: li „riskas nenion", krom „perdi sian salajron … la laboristo transdonas nenion materian". (Storch, „Cours d'Écon. Polit.", Petersburgo, 1815, vol., II, p. 36, 37)

59 Jen ekzemplo. En Londono ekzistas duspecaj bakistoj, la „full priced", kiu vendas la panon je ĝia plena valoro, kaj la „undersellers", kiu vendas ĝin sub tiu valoro. Tiu lasta klaso konsistigas pli ol $^{3}/_{4}$ de ĉiuj bakistoj (p. XXXII en la „raporto" de la registara komisaro H. S. Tremenheere pri la „Grievances complained of by the journeymen bakers etc.", Londono, 1862). Tiuj undersellers vendas, preskaŭ senescepte, panon falsitan per aldono de aluno, de sapo, de kalko, de gipso kaj de similaj ingrediencoj, same sanigaj kaj same nutraj. (Vd la blulibron supre cititan, la raporton de la „Committee of 1855 on the adulteration of bread" kaj tiun de D-ro Hassal: Adulterations detected, 2-a eld., Londono, 1862) Sir John Gordon deklaris antaŭ la Komitato de 1855 ke „sekve al tiuj falsadoj, la malriĉulo, kiu vivas ĉiutage per du funtoj da pano, nun ne ricevas kvaronon de la nutraj elementoj kiujn li bezonas, sen paroli pri la malbona influo kiun tiaj nutraĵoj havas sur lia sano." Por klarigi kial granda parto de la laborista klaso, kvankam tute konscia pri tiuj falsaĵoj, tamen akceptas ilin, Tremenheere donas tiun kialon (l.c., p. XLVII) „ke estas por ĝi neceso preni la panon ĉe la bakisto aŭ ĉe la detalvenda butiko, tia kian oni volas doni ĝin al ĝi." Ĉar la laboristoj estas pagataj nur semajnfine, ili povas mem pagi nur fine de la semajno la panon konsumitan dum tiu tempo de ilia familio, kaj Tremenheere aldonas, bazante sin sur la aserto de vidatestantoj: „Estas konate ke la pano preparita per tiaj miksaĵoj estas farita intence por tiuj praktikoj." (It is notorious that bread composed of those mixtures is made expressly for sale in this manner.) „En multaj kamparaj distriktoj en Anglio (sed multe pli en Skotlando) la salajro esta pagata dusemajne kaj eĉ monate. Pro tiuj longaj pagperiodoj la laboristo estas devigata aĉeti siajn varojn kredite, atendante sian pagon. Oni vendas al li ĉion je tre altaj prezoj, kaj li troviĝas fakte ligita al la butiko kiu pruntas al li kaj ekspluatas lin. Ekz-e en Horningsham en Wilts, kie la salajro estas monata, la sama faruno (ok funtoj) kostas al li po 2 ŝ. 4 d., kiu ĉie aliloke kostas 2 ŝ kvar pencoj." (Sixth Report on Public Health by The Medical Officer of the Privy Council, ktp, 1864, p. 264) „La koton-manpresistoj de Paisley kaj Kilmarnock (Okcidenta Skotlando) trudis 1853 per striko la mallongigon de la pagdato de unu monato al 14 tagoj."

ricevas ankaŭ tuj la kontraktitan prezon.

Ni konas nun la manieron laŭ kiu determiniĝas la valoro, kiun la monposedanto pagas al la posedanto de tiu aparta varo, la laborforto. La uzvaloro, kiun la monposedanto siavice ricevas interŝanĝe, montriĝas nur en sia reala konsumiĝo, en la konsumiĝprocezo de la laborforto. Ĉiujn aĵojn necesajn por tiu procezo, kiel krudmaterialon ktp, la monposedanto aĉetas sur la varmerkato kaj pagas ilian plenan prezon. La konsumiĝprocezo de la laborforto estas samtempe la produktadprocezo de varo kaj de plusvaloro. La konsumado de la laborforto, same kiel la konsumado de ĉia alia varo, okazas ekster la merkato aŭ de la cirkuladsfero. Ni forlasas do tiun bruan sferon kie ĉio okazas sur la surfaco videble por ĉiuj okuloj, kune kun la monposedanto kaj la laborfort-posedanto, por sekvi ilin en la kaŝitan produktejon, ĉe kies sojlo legeblas: Eniro nur por aferoj[60]. Tie montriĝos ne nur kiel la kapitalo produktas, sed ankaŭ kiel oni mem produktas ĝin, la kapitalon. La sekreto de plusfarado devas fine senvualiĝi.

La sfero de la cirkulado aŭ de la varinterŝanĝo, ene de kies limoj moviĝas aĉeto kaj vendo de la laborforto, estis efektive vera paradizo de la ennaskitaj homrajtoj. Kio sole regas ĉi tie, estas libereco, egaleco, proprieto kaj Bentham[61]. Libereco! Ĉar aĉetantoj kaj vendantoj de varo, ekz-e de laborforto, estas movataj nur de sia libera volo. Ili konktraktas kiel liberaj, jure samrajtaj personoj. La kontrakto estas la fina rezulto, en kiu iliaj voloj donas komunan juran esprimon. Egaleco! Ĉar ili rilatas unu al la alia nur kiel varposedantoj kaj interŝanĝas ekvivalenton kontraŭ ekvivalento. Proprieto! Ĉar ĉiu disponas nur pri la siaĵo. Bentham! Ĉar

(„Reports of the Inspectors of Factories for 31st Oct. 1853”, p. 34) Kiel alia bela evoluo de la kredito kiun la laboristo donas al la kapitalisto interpreteblas la metodo de multaj anglaj karbminejaj posedantoj, laŭ kiu la laboristo estas pagata nur fine de la monato kaj intertempe ricevas antaŭpagojn de la kapitalisto, ofte en formo de varoj, kiujn li devas pagi super la merkatprezo (truck-sistemo). „Estas kutimo de la karbsinjoroj pagi unufoje monate kaj doni ĝis tiam antaŭpagon al siaj laboristoj fine de ĉiu semajno. Tiu antaŭpago estas donata en la butiko (nome en la tommy-shop aŭ la butiko apartenanta al la mastro mem). „La viroj akceptas ĝin ĉe la unua flanko de la butiko kaj elspezas ĝin ĉe la alia flanko.” („Children's Employment Commission, III. Report”, Londono, 1864, p. 38, n-ro 192)

60 *En la originalo angle:* No admittance except on business.

61 Jeremy Bentham, Londono (1748-1832), brita filozofo kaj juristo, kies utilisma moralo baziĝas sur la kalkulo de plaĉo en proporcio kun doloro. Li aŭtoris grandan projekton pri arĥitekturo de malliberejoj. -vl

ĉiu el ambaŭ okupiĝas nur pri si mem. La sola povo, kiu kunigas ilin en rilaton, estas tiu de ilia egoismo, de ilia aparta profito, de iliaj privataj interesoj. Ĉiu pensas nur pri si, neniu zorgas pri la alia, kaj ĝuste pro tio, sekve al antaŭestablita harmonio de la aferoj aŭ sub la protekto de ĉiom-ruza providenco, ĉiuj plenumas nur la verkon de sia reciproka avantaĝo, de la komuna utilo, de la ĉioma intereso.

Ĉe la eliro el tiu sfero de simpla cirkulado aŭ varinterŝanĝo, el kiu la vulgara liberkomercisto pruntas ideojn, nociojn kaj mezurilon por sia antaŭjuĝo pri la socio de la kapitalo kaj de la dunglaboro, ŝajnas ke la trajtoj de niaj agantoj jam iom transformiĝas. La iama monposedanto paŝas antaŭen kiel kapitalisto, la posedanto de la laborforto sekvas lin kiel lia laboristo; la unua kun gravmiena rideto kaj afereme, la alia timeme, hezitante, kvazaŭ iu, kiu surmerkatigis sian propran haŭton kaj povas nun atendi nenion alian ol la – tanejon.

# TRIA SEKCIO – La produktado de la absoluta plusvaloro

## *KVINA ĈAPITRO – Laborprocezo kaj plivalorigprocezo*

### 1. Laborprocezo

La uzado de la laborforto estas la laboro mem. La aĉetanto de la laborforto konsumas ĝin, per tio ke li laborigas ĝian vendanton. Tiu fariĝas per tio efektive aganta laborforto, laboristo, kio li antaŭe estis nur imageble. Por prezenti sian laboron en varoj, li devas prezenti ilin ĉefe en uzvaloroj, aĵoj, kiuj servas por kontentigo de ia bezono. Estas do specifa uzvaloro, specifa artiklo, kiun la kapitalisto produktigas al la laboristo. La produktado de uzvaloroj aŭ havaĵoj ne ŝanĝas sian ĝeneralan naturon per tio ke ĝi okazas por la kapitalisto kaj sub ties kontrolado. La laborprocezo estas pro tio konsiderenda unue sendependa de ĉia socia formo.

La laboro estas unuavice procezo inter homo kaj naturo, procezo, en kiu la homo peras, kontrolas kaj regulas sian metabolon kun la naturo per sia propra agado. Li alpaŝas la naturon mem kiel naturpotenco. Li movas la naturfortojn apartenantajn al lia korpeco, brakojn, krurojn, kapon kaj manon, por alproprigi al si la naturmaterialon en formo uzebla por sia propra vivo. Per tio ke li efikas sur la naturo ekster si kaj ŝanĝas ĝin, per tiu sia movo, li samtempe ŝanĝas sian propran naturon. Li disvolvas la eblecojn kiuj kuŝas en li kaj submetas la ludon de iliaj fortoj al sia propra regado. Ĉi tie ne temas pri la unuaj animalece instinktaj formoj de laboro. Nemezurebla tempo disigas la staton, en kiu la laboristo kiel vendisto de sia propra laborforto aperas sur la varmerkato, de tiu pratempa stato, en kiu la homa laboro ankoraŭ ne demetis sian unuan instinktecan formon. Ni parolas pri la laboro en tiu formo en kiu ĝi apartenas ekskluzive al la homo. Araneo faras operaciojn similajn al tiuj de teksisto, kaj abelo hontigas per la konstruado de siaj vaksaj ĉeloj multajn homajn konstruistojn. Sed kio principe distingas la plej malbonan konstruiston de la plej bona abelo estas, ke li konstruis la ĉelon en sia kapo antaŭ ol konstrui ĝin

per vakso. Fine de la konstruado aperas rezulto, kiu ĉe sia komenco estis jam en la ideo de la laboristo, do ekzistis jam idee. Li ne realigas nur formŝanĝon de io natura; li realigas en tio natura samtempe sian celon, kiun li scias, kiu determinas la manieron de lia ago kiel leĝon kaj al kiu li devas submeti sian volon. Kaj tiu submetado ne estas momenta. Krom la streĉado de la laborantaj organoj necesas la celorientita volo, kiu montriĝas kiel atento, por la tuta daŭro de la laboro, kaj des pli, ju malpli ĝi per sia propra enhavo kaj la maniero de sia plenumado logas la laboriston, do ju malpli li ĝuas ĝin kiel ludo de siaj propraj korpaj kaj mensaj fortoj.

La simplaj elementoj de la laborprocezo estas la celorientita agado kaj la laboro mem, ĝia objekto kaj ĝiaj rimedoj.

La tero (en kiu ekonomie ankaŭ la akvo inkludiĝas), tia kia ĝi origine provizis la homon per nutraĵoj, per pretaj vivrimedoj[1], troviĝas sendepende de li kiel ĝenerala objekto de la homa laboro. Ĉiuj aĵoj, kiujn la laboro nur disigas de ilia rekta kunteksto kun la tuta tero, estas laborobjektoj trovataj en la naturo. Tiel la fiŝo, kiu estas disigata de sia vivelemento, la akvo, per kaptado, la ligno, hakata en la praarbaro, la erco, derompata de sia vejno kaj nun ellavata. Ĉia krudmaterialo estas laborobjekto, sed ne ĉia laborobjekto estas krudmaterialo. La laborobjekto estas krudmaterialo nur se ĝi jam ricevis ŝanĝon pere de laboro.

Laborilo estas aĵo aŭ komplekso de aĵoj, kiun la laboristo ŝovas inter si kaj la laborobjekton kaj kiu servas al li kiel kondukilo de lia agado pri tiu objekto. Li uzas la meĥanikajn, fizikajn, ĥemiajn ecojn de la aĵoj por efikigi ilin sur aliaj aĵoj laŭ sia celo.[2] La objekto, kiun la laboristo rekte ekuzas – se ni ne konsideras la kaptadon de pretaj vivrimedoj, ekz-e de fruktoj, ĉe kiu nur liaj korpaj organoj servas kiel laborilo – estas ne la laborobjekto, sed la laborilo. Tiel la natura aĵo fariĝas mem organo de lia agado, organo kiun li aldonas al siaj propraj korpaj organoj, pli longigante sian propran figuron, spite al la Biblio. Kiel la tero estas lia origina provizejo, tiel ĝi estas lia origina arsenalo de laboriloj. Ĝi liveras al li ekz-e la

1 „La naturaj produktoj de la tero, kiuj troviĝas etkvante kaj tute sendependaj de la homo, ŝajnas esti donita de la naturo en la sama maniero en kiu oni donas al junulo etan sumon, por konduki lin sur la vojon de diligento kaj de riĉiĝo." (James Steuart, Principles of Polit. Econ.", eld. Dublino, 1770, vol. I, p. 116)

2 „La racio estas same ruza kiel potenca. La ruzo konsistas entute en la peranta agado, kiu, igante la objektojn efiki unu al la alia laŭ sia propra naturo kaj prilabori unu la alian, sen rekte enmiksiĝi en tiun procezon, tamen plenumante nur sian celon." (Hegelo, „Enzyklopädie", Erster Teil, „Die Logik" [Hegelo, „Enciklopedio", Unua parto, „La logiko"], Berlino, 1840, p. 382)

ŝtonon per kiu li ĵetas, frotas, premas, tranĉas ktp. La tero mem estas laborilo, sed antaŭkondiĉas siavice por sia servo kiel laborilo en kampkulturado jam relative disvolvitan laborforton.[3] Ekde kiam la laborprocezo estas entute nur iom evoluinta, ĝi jam bezonas prilaboritajn laborilojn. En la plej praaj homkavernoj ni trovas ŝtonajn ilojn kaj ŝtonajn armilojn. Apud prilaborita ŝtono, ligno, osto kaj konkoj, en la komenco de la homa historio, la malsovaĝigita, do mem per laboro ŝanĝita besto ludas jam ĉefan rolon kiel laborilo.[4] Uzado kaj kreado de laboriloj, kvankam embrie jam propraĵo de certaj specioj de bestoj, karakterizas la specife homan laborprocezon, kaj Franklin difinas do la homon kiel *„a toolmaking animal”*, laborilfarantan animalon. Restaĵoj de laboriloj havas la saman gravecon por esplorado de pereintaj ekonomiaj sociordoj kiel la strukturo de ostaj restaĵoj havas por la esplorado de pereintaj animalspecioj. Ne *kio estas farata* distingas la ekonomiajn epokojn, sed *kiel, per kiaj laboriloj* oni faras ion.[5] Laboriloj estas ne nur mezuriloj por la evoluo de la homa laborforto, sed ankaŭ indikiloj de la sociaj kondiĉoj en kiuj oni laboras. Inter la laboriloj mem la meĥanikaj laboriloj, kies tutaĵo nomeblas la ost- kaj muskol-sistemo de la produktado, donas multe pli gravajn karakterizajn trajtojn de socia produktadepoko ol tiaj laboriloj kiuj servas nur kiel ujoj por la laborobjekto kaj kies tutaĵo nomeblas ĝenerale la ujsistemo de produktado, kiel ekz-e tuboj, bareloj, korboj, kruĉoj ktp. Ili ekludas gravan rolon ne antaŭ la epoko de ĥemia fabrikado.[6]

En pli larĝa senco la laborprocezo entenas kiel siajn rimedojn krom la aĵojn kiuj peras la efikon de la laboro al ĝia objekto kaj pro tio servas iel aŭ alie kiel kondukilo de la agado, ĉiujn konkretajn kondiĉojn necesajn por ke la procezo entute okazu. Ili ne rekte eniras en ĝin, sed ĝi povas

3 En la cetere mizera skribaĵo: „Théorie de l'Écon. Polit.”, Parizo, 1815, Ganilh prave nombras, kontraŭ la fiziokratoj, la grandan serion da laborprocezoj kiuj estas la antaŭkondiĉo de vera kampkulturado.

4 En la „Réflexions sur la Formation et la Distribution des Richesses [Pensadoj pri la formado kaj distribuado de la riĉaĵoj] (1766) Turgot bone montras la gravecon de la malsovaĝigita besto por la komencoj de la kulturo.

5 El ĉiaj varoj, veraj luksaj varoj estas la malplej gravaj por kompari la teĥnologion de diversaj produktadepokoj.

6 *Noto al la 2-a eld.:* Kvankam la ĝisnuna historiografio apenaŭ konas la evoluon de la materia produktado, do la bazon de ĉia socia vivo kaj pro tio de ĉia reala historio, oni almenaŭ dividis la prahistorion surbaze de natursciencaj, ne tiel nomataj historiaj, esploroj, laŭ la materialo de la iloj kaj armiloj en ŝtonepokon, bronzepokon kaj ferepokon.

tute ne aŭ ne komplete plenumiĝi sen ili. La ĝenerala tia laborilo estas ree la tero mem, ĉar ĝi donas al la laboristo la lokon kaj al lia procezo la efikospacon (field of employment). Tiaj laboriloj jam peritaj de la laboro estas ekz-e laborejoj, kanaloj, vojoj ktp.

En la laborprocezo la agado de la homo efikas pere de la laboriloj ŝanĝon de la laborobjekto dekomence celatan. La procezo estingiĝas en la produkto. Ĝia produkto estas uzvaloro, naturaĵo per formŝanĝoj adaptita al la homaj bezonoj. La laboro kunligiĝis kun sia objekto. Ĝi estas objektigita, kaj la objekto estas prilaborita. Tio, kio aperas flanke de la laboristo en la formo de moviĝo, aperas nun, flanke de la produkto, kiel io ripoza, en la formo de esto. La laboristo ŝpinis, kaj la produkto estas ŝpinaĵo.

Se konsideri la tutan procezon el vidpunkto de ĝia rezulto, de la produkto, tiam ambaŭ, laborilo kaj laborobjekto, aperas kiel produktadrimedoj[7], kaj la laboro mem kiel produktiva laboro[8].

Kiam uzvaloro eliras kiel produkto el la laborprocezo, tiam aliaj uzvaloroj, produktoj de antaŭaj laborprocezoj, eniras en ĝin kiel produktadrimedoj. La sama uzvaloro kiu konsistigas la produkton de tiu ĉi laboro, konsistigas la produktadrimedon de tiu laboro. Produktoj estas pro tio ne nur rezulto, sed samtempe kondiĉoj de la laborprocezo.

Escepte de la ekstrakta industrio, kiu trovas sian laborobjekton en la naturo, kiel minekpluatado, ĉasado, fiŝkaptado ktp (kampkulturo nur kiam ĝi kulturebligas virgan grundon), ĉiuj industriaj branĉoj pritraktas objekton, kiu estas krudmaterialo, t.e. laborobjekto jam filtrita de laboro, do mem jam laborprodukto, kiel ekz-e semo en kampkulturado. Bestoj kaj plantoj, kiujn oni kutimas rigardi kiel naturproduktojn, estas ne nur produktoj de laboro ekz-e de la lasta jaro, sed, en siaj nunaj formoj, produktoj de konstanta transformado sub homa kontrolado kaj per homa laboro de multaj generacioj. La laboriloj siavice montras en sia grandega plimulto al la plej supraĵa rigardo la spuron de estinta laboro.

Krudmaterialo povas esti la ĉefa substanco de produkto aŭ povas nur kiel helpmaterialo eniri en ĝian estiĝon. La helpmaterialo estas konsumata

7 Ŝajnas paradokse nomi ekz-e fiŝon, kiu ankoraŭ ne estis kaptita, produktadrimedo por fiŝkaptado. Sed ĝis nun oni ankoraŭ ne inventis la arton kapti fiŝojn en akvo en kiu ili ne troviĝas.

8 Tiu difino de produktiva laboro, el vidpunkto de simpla laborprocezo, tute ne sufiĉas por la kapitalisma produktadprocezo.

de la laborilo, kiel karbo de la vapormaŝino, oleo de la rado, fojno de la tirĉevalo, aŭ aldonata al la krudmaterialo por efiki en ĝi materian ŝanĝon, kiel kloro al la neblankigita tolo, karbo al fero, farbo al lano, aŭ ĝi subtenas la plenumadon de la laboro mem, kiel ekz-e materialoj uzataj por prilumado kaj hejtado de la laborejo. La diferenco inter ĉefaj kaj helpaj materialoj malklariĝas en la ĥemia fabrikado, ĉar neniu el la aplikataj krudmaterialoj reaperas kiel substanco de la produkto.[9]

Ĉar ĉiu aĵo posedas diversajn ecojn kaj pro tio taŭgas por diversa uzado, la sama produkto povas fariĝi krudmaterialo de tre diversaj laborprocezoj. Greno ekz-e estas krudmaterialo por muelisto, amelfabrikisto, distilisto, bredisto ktp. Ĝi fariĝas krudmaterialo de sia propra produktado, kiel semo. Tiel la karbo eliras kiel produkto el la minejo kaj kiel produktadrimedo[10] eniras ĝin.

La sama produkto povas en la sama laborprocezo servi kiel laborilo kaj krudmaterialo. Ekz-e ĉe brutnutrado, kie la bruto, la prilaborata krudmaterialo, estas samtempe rimedo por produktado de sterkaĵo.

La produkto, kiu ekzistas en formo preta por konsumo, povas fariĝi denove krudmaterialo de alia produkto, kiel la vinbero fariĝas krudmaterialo por vino. Aŭ la laboro adiaŭas sian produkton en formoj en kiuj ĝi uzeblas ree kiel krudmaterialo. Krudmaterialo en tiu stato nomiĝas duonfabrikaĵo kaj nomiĝus pli bone ŝtupfabrikaĵo, kiel ekz-e kotono, fadeno, tvirno ktp. Kvankam ĝi estas mem jam produkto, la origina krudmaterialo povas trairi tutan serion da diversaj procezoj, en kiuj ĝi ĉiam denove funkcias kiel krudmaterialo ĝis la lasta laborprocezo, kiu deĵetas ĝin kiel pretan vivrimedon aŭ pretan laborilon.

Oni vidas: Ĉu uzvaloro aperas kiel krudmaterialo, laborilo aŭ produkto, tio tute dependas de ĝia funkcio en la laborprocezo, de la loko kiun ĝi okupas en ĝi, kaj kun la ŝanĝo de tiu loko ŝanĝiĝas tiuj difinoj.

Per sia eniro kiel produktadrimedo en novajn laborprocezojn la produktoj do perdas la karakteron de produkto. Ili funkcias jam nur kiel aĵaj faktoroj de la viva laboro. La ŝpinisto traktas la ŝpinilon[11] nur kiel

9 Storch distingas la veran krudmaterialon kiel „matière” disde la helpmaterialoj kiel „matériaux”; Cherbuliez nomas la helpmaterialojn „matières instrumentales”.

10 La terminoj produktadrimedo (aŭ produktilo) kaj laborilo (aŭ laborrimedo) estas de Markso sinonime uzataj. -vl

11 Ĉi tie kaj en la sekvo, mi nomas *ŝpinrado* la simplan hejman meĥanismon turnatan per piedo, kaj *ŝpinilo* la feran vergon sur kiun oni metas la

rimedon per kiu li ŝpinas, la linon nur kiel objekton, kiun li ŝpinas. Tamen ne eblas ŝpini sen ŝpinmaterialo kaj ŝpinilo. La ĉeesto de tiuj produktoj[12] estas do antaŭkondiĉita ĉe komenco de ŝpinado. Sed en tiu procezo mem tute ne gravas la fakto, ke lino kaj ŝpinilo estas produktoj de estinta laboro, same kiel ne gravas ke dum nutriĝo la pano estas produkto de antaŭaj laboroj de terkulturisto, muelisto, bakisto ktp. Inverse jes ja. Se produktadrimedoj montras en la laborprocezo sian econ kiel produktoj de estinta laboro, tiam per siaj mankoj. Tranĉilo kiu ne tranĉas, fadeno kiu konstante ŝiriĝas ktp vigle memorigas la tranĉilforĝiston A kaj la fadenfariston E. En la sukcesa produkto la perado de ĝiaj uzkvalitoj fare de estinta laboro estingiĝis.

Maŝino, kiu ne servas en la laborprocezo, estas senutila. Krome ĝi difektiĝas pro la detrua forto de la natura metabolo. Fero rustiĝas, ligno putras. Fadeno, kiu ne estas teksata aŭ trikata, estas ruba kotono. La viva laboro devas kapti tiujn aĵojn, veki ilin el la mortodormo, transformi ilin el nur eblaj en realajn kaj efikantajn uzvalorojn. Prilekita de la fajro de la laboro, alproprigita de la laboro kiel ties korpoj, alvokitaj en la procezo al siaj propraj funkcioj, ili estas ja ankaŭ konsumataj, sed laŭcele, kiel estigaj elementoj de novaj uzvaloroj, de novaj produktoj, kiuj kapablas kiel vivrimedoj eniri en la individuan konsumadon aŭ kiel produktadrimedoj en novan laborprocezon.

Se do ekzistantaj produktoj estas ne nur rezultoj, sed ankaŭ ekzistadkondiĉoj de la laborprocezo, aliflanke ilia enĵetiĝo en la procezon, do ilia kontakto kun viva laboro, estas la sola rimedo por konservi kaj realigi tiujn produktojn de estinta laboro kiel uzvalorojn.

La laboro konsumas siajn materiajn elementojn, sian objekton kaj siajn rimedojn, konsumas ilin kaj estas do konsumprocezo. Tiu produktiva konsumado distingiĝas de la individua konsumado per tio ke tiu lasta konsumas la produktojn kiel vivrimedojn de la vivanta individuo, dum la unua konsumas ilin kiel vivrimedon de la laboro, de ĝia aganta laborforto. La produkto de la individua konsumado estas do la konsumanto mem, la rezulto de la produktiva konsumado estas produkto alia ol la konsumanto.

En la mezuro laŭ kiu ĝia rimedo kaj ĝia objekto estas mem jam produktoj, la laboro konsumas produktojn por krei produktojn, aŭ konsumas produktojn kiel produktadrimedojn por produktoj. Sed kiel la laborpro-

fadenbobenon (ankaŭ nomata *spindelo*) en ŝpinmaŝino, ĉe industria ŝpinado. -vl

12 *En la 4-a eldono:* de tiu produkto.

cezo origine okazas nur inter la homo kaj la tero, kiu ekzistas sendepende de li, tiel daŭre servas en la laborprocezo ankaŭ tiaj produktadrimedoj kiujn la naturo rekte provizas kaj kiuj ne estas kombinaĵo el natura substanco kaj homa laboro.

La laborprocezo, tia kian ni prezentis en ĝiaj simplaj kaj abstraktaj elementoj, estas celorientita agado por produktado de uzvaloroj, alproprigo de naturaĵo por homaj bezonoj, ĝenerala kondiĉo de la metabolo inter homo kaj naturo, eterna naturkondiĉo de la homa vivo kaj pro tio sendependa de ĉia formo de tiu vivo, sed male, komuna same al ĉiuj ĝiaj sociaj formoj. Pro tio ni ne bezonis prezenti la laboriston en lia rilato al aliaj laboristoj. Sufiĉis unuflanke la homo kaj lia laboro, aliflanke la naturo kaj ĝiaj substancoj. Same kiel oni ne sentas per la gusto de la tritiko tiun kiu kultivis ĝin, tiel oni ne vidas ĉe tiu procezo, en kiuj kondiĉoj ĝi okazas, ĉu sub la brutala vipo de sklavgardisto aŭ sub la zorga okulo de la kapitalisto, ĉu Cincinato plenumas ĝin per kulturado de siaj kelkaj terpecoj aŭ la sovaĝulo kiu mortigas bestion per ŝtono.[13]

Ni revenu al nia estonta kapitalisto. Ni forlasis lin, post kiam li aĉetis sur la varmerkato ĉiujn faktorojn necesajn por laborprocezo, la aĵajn faktorojn aŭ produktadrimedojn, la personan faktoron aŭ laborforton. Per sperta rigardo li elektis la taŭgajn produktadrimedojn kaj laborfortojn por sia aparta afero, ŝpinado, botfarado ktp. Nia kapitalisto do komencas konsumi la aĉetitan varon, la laborforton, t.e. li igas la portanton de la laborforto, la laboriston, konsumi la produktadrimedojn per sia laboro. La ĝenerala naturo de la laborprocezo kompreneble ne ŝanĝiĝas per tio, ke la laboristo plenumas ĝin por la kapitalisto, anstataŭ por si mem. Sed ankaŭ la ĝenerala maniero, en kiu oni faras botojn aŭ ŝpinas fadenojn, unue ne povas ŝanĝiĝi per interveno de la kapitalisto. Li devas unue preni la laborforton tia kian li trovas ĝin sur la merkato, do ankaŭ ĝian laboron tia kia ĝi kongruis kun periodo en kiu ankoraŭ ne ekzistis kapitalistoj. La transformado de la produktadmaniero mem per la subigo de la laboro sub la kapitalon povas okazi nur poste kaj analizendas do nur poste.

---

13 Verŝajne pro tiu ege logika kaŭzo la kolonelo Torrens malkovras en la ŝtono de la sovaĝulo – la originon de la kapitalo. „En la unua ŝtono, kiun la sovaĝulo ĵetas sur la bestion, kiun li persekutas, en la unua bastono kiun li kaptas por malsupren tiri la frukton kiun li ne povas kapti per siaj manoj, ni vidas la alproprigon de artiklo cele al akiro de alia kaj tiel malkovras – la originon de la kapitalo.” (R. Torrens, „An Essay on the Production of Wealth etc.”, p. 70, 71) El tiu unua bastono supozeble klarigeblas, kial en la angla lingvo *stock* sinonimas kun kapitalo. [Ironie: *stock* estas ankaŭ germana vorto kaj tie signifas bastono. -vl]

La laborprocezo, tia kia ĝi okazas kiel konsumadprocezo de la laborforto pere de la kapitalisto, montras nun du apartajn fenomenojn.

La laboristo laboras sub la kontrolo de la kapitalisto, al kiu apartenas lia laboro. La kapitalisto atentas ke la laboro okazu bone kaj ke la produktadrimedoj estu uzataj celkonforme, do ke nenia krudmaterialo estu malŝparata kaj ke la laborilo estu domaĝata, t.e. nur tiom detruata kiom ĝia uzado en la laboro necesas.

Sed due: La produkto estas proprieto de la kapitalisto, ne de la rekta produktanto, de la laboristo. La kapitalisto pagas ekz-e la tagvaloron de la laborforto. Ĝia uzado, kiel tiu de ĉia alia varo, ekz-e de ĉevalo, kiun li luprenis por unu tago, do apartenas al li por la tago. La uzado de la varo apartenas al la aĉetinto de la varo, kaj la posedanto de la laborforto donas efektive nur la uzvaloron venditan de li, per tio ke li donas sian laboron. Ekde la momento en kiu li eniris la laborejon de la kapitalisto, la uzvaloro de lia laborforto, do ĝia uzado, la laboro, apartenas al la kapitalisto. La kapitalisto, per la aĉeto de la laborforto, enkorpigis la laboron mem kiel vivantan fermentilon al la mortaj konsistigaj elementoj de la produkto, kiuj ankaŭ apartenas al li. El lia vidpunkto la laborprocezo estas nur la konsumado de la aĉetita varo laborforto, kiun li tamen povas konsumi nur per tio ke li aldonas al ĝi produktadrimedojn. La laborprocezo estas procezo inter aĵoj kiujn la kapitalisto aĉetis, inter aĵoj apartenantaj al li. La produkto de tiuj aĵoj apartenas tute al li, same kiel la produkto de fermenta procezo en lia vinkelo.[14]

14 „La produktoj estas alproprigitaj, antaŭ ol esti transformitaj en kapitalon; tiu transformado ne malhelpas ilian alproprigon." (Cherbuliez, „Richesse ou Pauvreté", édit. Parizo, 1841, p. 54) „Per tio ke la laboristo vendas sian laboron kontraŭ certa kvanto da vivrimedoj (approvisionnement), li komplete rezignas pri ĉia ajn parto de la produkto. La alproprigo de la produktoj restas la sama kiel antaŭe; ĝi neniel ŝanĝiĝis per la menciita konvencio. La produkto apartenas ekskluzive al la kapitalisto, kiu liveris la krudmaterialojn kaj la provizadon. Tio estas severa konsekvenco de la leĝo de alproprigo, kies fundamenta principo estis inverse la ekskluziva proprietrajto de ĉiu laboristo je sia produkto." (sl., p. 58) James Mill, „Elements of Pol. Econ. etc.", p. 70, 71: „Kiam la laboristoj laboras pro salajro, tiam la kapitalisto estas proprietulo ne nur de la kapitalo (signifas ĉi tie la produktadrimedoj), sed ankaŭ de la laboro (of the labour also). Se oni inkludas tion, kion oni pagas kiel salajron, kiel kutime, en la nocion kapitalo, tiam estas absurde paroli pri la laboro dise de kapitalo. La vorto kapitalo en tiu senco inkludas ambaŭ, kapitalon kaj laboron."

# 2. Plivalorigprocezo

La produkto – la proprieto de la kapitalisto – estas uzvaloro, fadeno, botoj ktp. Sed kvankam botoj ekz-e estas iel la bazo de la socia progreso kaj nia kapitalisto estas decida progresisto, li fabrikas botojn ne por botoj kiel fina celo. La uzvaloro entute ne estas io kion oni ŝatas kiel finan celon en la varproduktado.[15] Uzvalorojn oni tie produktas ĝenerale nur ĉar kaj en la mezuro laŭ kiu ili estas materia substrato, portanto de interŝanĝvaloro. Kaj por nia kapitalisto temas pri du aferoj: Unue li volas produkti uzvaloron kiu havas interŝanĝvaloron, artiklon destinitan al vendo, varon. Kaj due li volas produkti varon, kies valoro estas pli alta ol la valorsumo de la varoj necesaj por ĝia produktado, de la produktadrimedoj kaj de la laborforto kiujn li antaŭpagis per sia bona mono sur la varmerkato. Li volas ne nur produkti uzvaloron, sed varon, ne nur uzvaloron, sed valoron, kaj ne nur valoron, sed ankaŭ plusvaloron.

Efektive, ĉar temas ĉi tie pri varproduktado, ni konsideris ĝis nun evidente nur unu flankon de la procezo. Kiel la varo mem estas unueco de uzvaloro kaj valoro, ĝia produktadprocezo devas esti unueco de laborprocezo kaj valorestiga procezo.

Ni rigardu do la produktadprocezon nun ankaŭ kiel valorestigan procezon.

Ni scias, ke la valoro de ĉia varo estas determinita de la kvanto da laboro materiigita en ĝia uzvaloro, de la labortempo socie necesa por ĝia produktado. Tio validas ankaŭ por la produkto kiu rezultiĝis por nia kapitalisto el la laborprocezo. Necesas do unue kalkuli la laboron konkretigitan en tiu produkto.

Tiu estu do ekz-e fadeno.

Por produktado de la fadeno necesis unue ĝia krudmaterialo, ekz-e 10 funtoj da kotono. Ne necesas unue analizi la valoron de la kotono, ĉar la kapitalisto aĉetis ĝin sur la merkato je ĝia valoro, ekz-e je 10 ŝ. En la prezo de la kotono la laboro necesa por ĝia produktado estas jam prezentita kiel ĝenerale socia laboro. Ni supozu krome, ke la ŝpinilmaterialo, kiu reprezentu ĉi tie ĉiujn aliajn laborilojn, havas valoron de 2 ŝ. Se oro de 12 ŝ estas la produkto de 24 laborhoroj aŭ de du labortagoj, tiam sekvas unue ke en la fadeno estas du labortagoj konkretigitaj.

La cirkonstanco, ke la kotono ŝanĝis sian formon kaj ke la konsumita ŝpinilmaterialo tute malaperis, ne konfuzu nin. Laŭ la ĝenerala valorleĝo, ekz-e 10 funtoj da fadeno estas ekvivalento de 10 funtoj da kotono kaj 1/4 ŝpinilo, se la valoro de 40 funtoj da fadeno = la valoro de 40 funtoj da kotono + la valoro de tuta ŝpinilo, t.e. se la sama labortempo necesas por

15 *En la originalo:* „… Ding qu'on aime pour lui-même …”. -vl

produkti ambaŭ flankojn de tiu ekvacio. Tiukaze la sama labortempo prezentiĝas jen en la uzvaloro fadeno, jen en la uzvaloroj kotono kaj ŝpinilo. La valoro estas do indiferenta pri tio, ĉu ĝi aperas en fadeno, ŝpinilo aŭ kotono. La fakto ke ŝpinilo kaj kotono, anstataŭ kuŝi trankvile unu apud la alia, eniras kombiniĝon kiu ŝanĝas ilian uzformon, ŝanĝas ilin en fadenon, tute ne tuŝas ilian valoron, kvazaŭ ili estus aperintaj tia per simpla interŝanĝo kontraŭ ekvivalento.

La labortempo necesa por produktado de la kotono estas parto de la produktado de la fadeno, kies krudmaterialo ĝi estas, kaj pro tio entenata en la fadeno. Same okazas pri la labortempo necesa por produktado de la ŝpinilmaterialo, sen ties konsumado la kotono ne ŝpineblas.[16]

Por taksi la valoron de la fadeno, do la labortempon necesan por ĝia produktado, la diversaj apartaj laborprocezoj, tempe kaj space disaj, kiuj estas plenumendaj por produkti la kotonon mem kaj la konsumitan ŝpinilmaterialon por fine fari fadenon el kotono kaj ŝpiniloj, konsidereblas kiel diversaj sinsekvaj fazoj de unu sama laborprocezo. Ĉiuj en la fadeno entenata laboro estas pasinta laboro. La fakto ke la labortempo por produktado de ĝiaj konsistigaj elementoj okazis pli frue, en tempo -is -inta, kaj ke la laboro aplikita rekte en la fina procezo, la ŝpinado, en la is-tempo, tio estas tute indiferenta cirkonstanco. Se certa kvanto da laboro, ekz-e de 30 labortagoj, necesas por konstrui domon, tiam nenio ŝanĝas ion de la ĉioma kvanto de la labortagoj enkorpigita en la domon ke la 30-a labortago eniris la produktadon 29 tagojn pli malfrue ol la unua labortago. Kaj tiel la labortempo entenata en la labormaterialo kaj en la laborrimedoj konsidereblas tute kvazaŭ ili estus elspezita nur en pli frua stadio de la ŝpinprocezo, antaŭ la laste aldonita laboro de ŝpinado.

La valoroj de la produktadrimedoj, de la kotono kaj de la ŝpiniloj, esprimitaj en la prezo de 12 ŝ, konsistigas do elementojn de la fadenvaloro aŭ de la valoro de la produkto.

Tamen plenumendas du kondiĉoj. Unue, kotono kaj ŝpiniloj devas esti servintaj reale por produktado de la uzvaloro. En nia kazo, ili devas esti fariĝintaj fadeno. Kiu uzvaloro portas ĝin, tio estas indiferenta al la valoro, sed uzvaloro devas porti ĝin. Dua kondiĉo estas ke aplikiĝis nur labortempo necesa sub la donitaj sociaj produktadkondiĉoj. Do, se necesus nur 1 funto da kotono por ŝpini 1 funton da fadeno, tiam nur 1

16 „Ne nur la labortempo rekte aplikita al varoj influas ĝian valoron, sed ankaŭ la laboro kiu estis aplikita al ekipaĵoj, laboriloj kaj konstruaĵoj kiuj subtenas la rekte elspezitan laboron." (Ricardo, l.c., p. 16)

funto da kotono devas esti konsumita en la estiĝo de 1 funto da fadeno. Same okazas pri la ŝpinilo. Se la kapitalisto havas la ideon apliki orajn anstataŭ ferajn ŝpinilojn, tiam en la fadenvaloro validas tamen nur la socie necesa laboro, t.e. la labortempo necesa por produkti ferajn ŝpinilojn.

Ni scias nun, kiun parton de la fadenvaloro la produktadrimedoj, kotono kaj ŝpinilo konsistigas. Ĝi estas 12 ŝ aŭ la materiiĝo de du labortagoj. Temas do nun pri la valorparto, kiun la laboro de la ŝpinisto mem aldonas al la kotono.

Ni devas rigardi tiun laboron nun el tute alia vidpunkto ol dum la laborprocezo. Tie temis pri la laŭcela agado transformi kotonon en fadenon. Ju pli laŭcela la laboro, des pli bona la fadeno, se konsideri ĉiujn aliajn cirkonstancojn senŝanĝaj. La laboro de la ŝpinisto estis specife malsama ol aliaj produktivaj laboroj, kaj la malsameco montriĝis subjektive kaj objektive, en la aparta celo de ŝpinado, en lia aparta farmaniero, en la aparteco de liaj produktadrimedoj, en la aparta uzvaloro de lia produkto. Kotono kaj ŝpinilo servas kiel vivrimedo de la ŝpinado, sed oni ne povas fari el ili kanelitajn kanonojn. Sed aliflanke, se konsideri la laboron de la ŝpinisto kiel valorestigan, t.e. valorfonton, ĝi estas ja tute ne malsama ol la laboro de la kanonfaristo, aŭ, kio estas ĉi tie pli proksima de ni, de la laboroj realigitaj en la produktadrimedoj de la fadeno, de la kotonkultivisto kaj de la ŝpinilfaristo. Nur pro tiu identeco, kotonplantado, ŝpinilfarado kaj ŝpinado povas konsistigi nur kvante diversajn partojn de la sama ĉiomvaloro, de la fadenvaloro. Ĉi tie jam ne temas pri la kvalito, la eco kaj la enhavo de la laboro, sed jam nur pri ĝia kvanto. Tiu estas facile nombrebla. Ni supozu ke la ŝpinlaboro estas simpla laboro, socia mezuma laboro. Oni vidos poste, ke la kontraŭa supozo ŝanĝas neniom en la afero.

Dum la laborprocezo la laboro konstante transformiĝas el la formo de moviĝo en tiun de stato, en formon de konkreteco. Fine de la laborhoro la ŝpinmoviĝo estas prezentita en certa kvanto da fadeno, do, certa kvanto da laboro, laborhoro, enkorpigita en la kotonon. Ni diras laborhoro, t.e. la elspezo de la vivforto de la ŝpinisto dum horo, ĉar la laboro de ŝpinado validas ĉi tie nur en tio ke ĝi estas elspezo de laborforto, ne en tio ke ĝi estas specifa laboro de ŝpinado.

Decide gravas ke dum la daŭro de la procezo, t.e. de la transformado de kotono en fadenon, konsumiĝu nur la socie necesa labortempo. Se sub normalaj, t.e. mezumaj sociaj produktadkondiĉoj, a funtoj da kotono dum unu laborhoro devas esti transformitaj en b funtoj da fadeno, tiam la labortago validas nur kiel 12-hora labortago kiu transformas 12 x a

funtojn da kotono en 12 x b funtojn da fadeno. Ĉar nur la socie necesa labortempo konsidereblas valorestiga.

Kiel la laboro mem, tiel ankaŭ krudmaterialo kaj produkto aperas ĉi tie en tute alia lumo ol el la vidpunkto de la vera produktadprocezo. La krudmaterialo konsidereblas ĉi tie nur kiel sorbanto de certa kvanto da laboro. Per tiu sorbado ĝi transformiĝas fakte en fadenon, ĉar la laborforto estas elspezita en formo de ŝpinado kaj aldonita al ĝi. Sed la produkto, la fadeno, estas nun jam nur mezurilo de la laboro ensorbita de la kotono. Se en unu horo ŝpiniĝas $1^{2}/_{3}$ funtoj da kotono aŭ transformiĝas en $1^{2}/_{3}$ funtoj da fadeno, tiam 10 funtoj da fadeno indikas 6 sorbitajn laborhorojn. Certaj kaj laŭsperte konstatitaj kvantoj da produkto prezentas nun jam nenion ol certajn kvantojn da laboro, certan kvanton da kristaliĝinta labortempo. Ili estas jam nur materiiĝo de unu horo, du horoj, unu tago da socia laboro.

La fakto ke la laboro estas ĉi tie ŝpinado, ĝia materialo kotono kaj ĝia produkto fadeno, fariĝas ĉi tie same indiferenta kiel la fakto ke la laborobjekto estas mem jam produkto, do krudmaterialo. Se la laboristo laborus, anstataŭ en la ŝpinejo, en karbminejo, tiam la laborobjekto, karbo, troviĝus tie jam de la naturo. Tamen certa kvanto da karbo rompita el la kuŝejo, ekz-e cent kilogramoj[17], reprezentas certan kvanton da sorbita laboro.

Ĉe la vendo de la laborforto ni supozis ke ĝia tagvaloro = 3 ŝ, kaj ke 6 laborhoroj estas entenataj en tiu sumo, ke tiu laborkvanto do necesas por produkti la mezuman sumon de la ĉiutagaj vivrimedoj de la laboristo. Se nia ŝpinisto transformas dum unu laborhoro $1^{2}/_{3}$ funtojn da kotono en $1^{2}/_{3}$ funtojn da fadeno[18], tiam en 6 horoj 10 funtojn da kotono en 10 funtojn da fadeno. Dum la daŭro de la ŝpinado la kotono ensorbas do 6 laborhorojn. La sama labortempo prezentiĝas en orkvanto de 3 ŝ. La ŝpinado mem aldonas do al la kotono valoron de 3 ŝ.

Ni rigardu nun la ĉiomvaloron de la produkto, de la 10 funtoj da fadeno. En ili, $2^{1}/_{2}$ labortagoj estas konkretigitaj, 2 tagoj estas entenataj en kotono kaj ŝpiniloj, $^{1}/_{2}$ tago da laboro sorbita dum la ŝpinado. La sama laborkvanto prezentiĝas en orkvanto de 15 ŝ. La prezo kiu respondas al la valoro de la 10 funtoj da fadeno estas do 15 ŝ, la prezo de funto da fadeno 1 ŝ 6 d.

17 *En la originalo:* „… ein Zentner …” (germana mezuro de 50 kilogramoj, en Aŭstrio kaj Svislando: 100 kilogramoj). -vl

18 La nombroj estas ĉi tie tute arbitraj.

Nia kapitalisto surpriziĝas. La valoro de la produkto egalas al la valoro de la antaŭpagita kapitalo. La antaŭpagita valoro ne plivaloriĝis, ne kreis plusvaloron, mono do ne transformiĝis en kapitalon. La prezo de la 10 funtoj da fadeno estas 15 ŝ., kaj 15 ŝ. estis elspezitaj sur la varmerkato por la estiĝaj elementoj de la produkto aŭ, alivorte, por la faktoroj de la laborprocezo: 10 ŝ. por kotono, 2 ŝ. por la konsumitaj ŝpiniloj kaj 3 ŝ. por la laborforto. La sumigita valoro de la fadeno tute ne helpas, ĉar ĝia valoro estas nur la sumo de la antaŭe al kotono, ŝpiniloj kaj laborforto dise elspezitaj valoroj, kaj el tia nura sumigo de ekzistantaj valoroj neniam povas fonti plusvaloro.[19] Tiuj valoroj estas nun ĉiuj koncentritaj sur unu aĵo, sed tiaj ili estis en la monsumo de 15 ŝ., antaŭ ol tiu dissplitiĝis per la tri varaĉetoj.

Per si mem tiu rezulto ne estas stranga. La valoro de funto da fadeno estas 1 ŝ. 6 d., kaj por 10 funtoj da fadeno nia kapitalisto devus do pagi sur la varmerkato 15 ŝ. Ĉu li aĉetas sian privatan domon preta sur la merkato aŭ ĉu li mem konstruigas ĝin, neniu el tiuj operacioj pliigus la monon elspezitan en akiro de la domo.

La kapitalisto, kiu tre bone konas la vulgarekonomion, eble diras, ke li antaŭpagis sian monon kun la intenco fari pli da mono el ĝi. Sed la vojo al infero estas pavumita per bonaj intencoj, kaj li povis same bone intenci fari monon sen produkti.[20] Li minacas. Oni ne denove trompos lin. Estonte li aĉetos, sur la varmerkato, tutpretajn varojn anstataŭ fabriki ilin mem. Sed se ĉiuj kapitalistaj kolegoj farus same, kiel li trovus varojn sur la merkato? Tamen li ne povas manĝi sian monon. Li do admonas nin: oni devus pripensi lian abstinadon. Li povintus fordiboĉi siajn 15 ŝilingojn. Anstataŭ tio li konsumis ilin produktive farante fadenon el ili. Sed pro tio li ja posedas fadenon anstataŭ konsciencriproĉojn. Li tute ne bezonas

19 Tiu estas la fundamenta teoremo, sur kiu baziĝas la instruo de la fiziokratoj pri la neproduktivo de ĉia ne kampkultura laboro, kaj ĝi estas ne renversebla por la ekonomikisto – titolata. „Tiu maniero, alkalkuli al unu sola objekto la valoron de pluraj aliaj (ekz-e al la lino la vivtenadon de la teksisto), do, por tiel diri, amasigi diversajn valorojn tavole sur unu solan, havas la efikon ke tiu en sama kvanto kreskas … La esprimo adicio tre bone signas la manieron kiel la prezo de la metiaj produktoj fariĝas; tiu prezo estas nur la ĉioma sumo de pluraj elkonsumitaj kaj sumigitaj valoroj; sed adicii ne signifas obligi." (Mercier de la Rivière, l.c., p. 599)

20 Tiel ekz-e li eltiris 1844-1847 parton de sia kapitalo el la produktiva afero por forspekuladi ĝin en fervojaj akcioj. Tiel, tempe de la usona interna milito, li fermis la fabrikon kaj ĵetis la laboriston sur la straton, por ludi en la kotonborso de Liverpulo.

refali en la rolon de trezorfaristo, kiu montris al ni tion kio rezultas ĉe la asketismo. Krome, kie estas nenio, la reĝo perdis siajn rajtojn. Kio ajn estas la merito de lia abstinado, estas nenio por pagi ĝin aparte, ĉar la valoro de la produkto, kiu rezultas el la procezo, egalas nur al la sumo de la en ĝin enĵetitaj varvaloroj. Li do trankviliĝu per la penso ke virto estas ĝia propra rekompenco. Anstataŭ tio, li fariĝas ĝena. La fadeno ne utilas al li. Li produktis ĝin por vendo. Do, li vendu ĝin, aŭ eĉ pli simple, li produktu estontece nur aĵojn por sia propra bezono, recepto kiun preskribis al li jam lia familia kuracisto MacCulloch kiel taŭgan rimedon kontraŭ la epidemio de superproduktado. Li obstine prancas. Ĉu la laboristo per siaj propraj brakoj kaj kruroj produkti varojn el nenio? Ĉu li ne donis al li la materialon per kiu kaj en kiun li sole povas enkorpigi sian laboron? Ĉar nun la plej granda parto de la socio konsistas el tiaj nenihavuloj, ĉu li ne faris al la socio per siaj produktadrimedoj, sia kotono kaj sia ŝpinilo, senmezuran servon, ĉu ne al la laboristo mem, kiun li provizis krome per vivrimedoj? Kaj ĉu li ne fakturu la servon? Sed ĉu la laboristo ne faris al li la servon transformi kotonon kaj ŝpinilon en fadenon? Krome temas ĉi tie ne pri servoj.[21] Servo estas nenio alia ol la utila efiko de uzvaloro, ĉu de varo, ĉu de laboro.[22] Sed ĉi tie temas pri interŝanĝvaloro. Li pagis al la laboristo la valoron de 3 ŝ. La laboristo redonis al li precizan ekvivalenton en la valoro de 3 ŝ. aldonitan al la kotono. Valoro kontraŭ valoro. Nia amiko, ĵus ankoraŭ plena de kapitalista arogo, subite alprenas la sintenon de sia propra laboristo. Ĉu li ne mem laboris? Ĉu li ne faris la laboron de kontrolado, de superrigardo super la ŝpinisto? Ĉu tiu lia laboro

21 „Lasu glori, ornami kaj beligi … Sed kiu prenas pli aŭ ion pli bonan (ol li donas), tio estas uzuro, kaj nomiĝas ne servo, sed fari damaĝon al sia proksimulo, same kiel per ŝtelo kaj rabo. Ne estas ĉio servo kaj bonfaro al la proksimulo kion oni nomas servo kaj bonfaro. Ĉar adultulino kaj adultulo faras al si reciproke grandan servon kaj bonfaron. Kavaliro faras al murdisto grandan kavalirservon, per tio ke li helpas lin sur la vojo rabi, militi kontraŭ ĉiuj. La papistoj faras al niaj kredantoj grandan servon ke ili ne ĉiujn dronigas, bruligas, murdas, putrigas en malliberejo, sed ja lasas kelkajn vivi kaj forpelas ilin aŭ prenas de ili kion ili havas. La diablo mem faras al siaj servantoj grandan, nemezureblan servon … Resume, la mondo estas plena de grandaj bonegaj ĉiutagaj servoj kaj bonfaroj.” (Martin Luther, „An die Pfarrherrn, wider den Wucher zu predigen etc.”, Wittenberg, 1540 [Marteno Lutero: Al la pastroj por prediki kontraŭ uzuro ktp”, Vitenbergo, 1540].

22 Mi rimarkigas pri tio en „Zur Kritik der Pol. Oek. [Kontribuaĵo al la Kritiko de la politika ekonomio]”, p. 14 divl.: „Oni komprenas, kian 'servon' la kategorio 'servo' (service) devas fari al speco de ekonomikistoj kiel J. B. Say kaj F. Bastiat.” <Vd vol. 13, p. 24>

ne kreas ankaŭ valoron? Lia propra kontrolisto kaj lia manaĝero suprentiras la ŝultrojn. Sed intertempe li kun serena rideto remontras sian kutiman mienon. Li primokis nin per la tuta litanio. Li fajfus pri ĉio ĉi. Li lasas tiujn kaj similajn artifikojn kaj ruzaĵojn al la profesoroj pri politika ekonomio, ja pagataj por tio. Li mem estas praktika homo, kiu, estas vere, ne ĉiam pripensas kion li diras ekster la negoco, sed kiu ĉiam scias kion li faras en la negoco.

Ni rigardu pli proksimen. La tagvaloro de la laborforto estis 3 ŝ, ĉar en ĝi mem duona labortago estis konkretigita, t.e. ĉar la vivrimedoj necesaj por la ĉiutaga produktado de la laborforto kostas duonan labortagon. Sed la pasinta laboro, kiu troviĝas en la laborforto, kaj la viva laboro, kiun ĝi povas fari, alivorte ĝiaj ĉiutagaj kostoj de vivtenado kaj ĝia ĉiutaga elspezado, estas du tute diversaj grandoj. La unua determinas ĝian interŝanĝvaloron, la alia konsistigas ĝian uzvaloron. La fakto ke duona labortago necesas por vivteni lin dum 24 horoj, tute ne malhelpas la laboriston labori tutan tagon. La valoro de la laborforto kaj ĝia aplikado en la laborprocezo estas do du diversaj grandoj. Tiun valordiferencon celis la kapitalisto kiam li aĉetis la laborforton. Ĝia utila eco, fari fadenon aŭ botojn, estis nur nepra kondiĉo, ĉar necesas elspezi laboron en utila formo por estigi valoron. Sed kio estis decida, tio estas la specifa uzvaloro de tiu varo, esti fonto de valoro kaj de pli da valoro ol ĝi mem havas. Jen la specifa servo kiun la kapitalisto atendas. Kaj ĉe tio li agas laŭ la eternaj leĝoj de la varinterŝanĝo. Efektive, la vendisto de la laborforto, kiel la vendisto de ĉia alia varo, realigas ĝian interŝanĝvaloron kaj donas ĝian uzvaloron. Li ne povas ricevi la unuan sen fordoni la alian. La uzvaloro de la laborforto, la laboro mem, tute ne apartenas al la vendisto, same kiel la uzvaloro de la vendita oleo ne apartenas al la olevendisto. La monposedanto pagis la tagvaloron de la laborforto; al li do apartenas ĝia uzado dum la tago, la taglonga laboro. La cirkonstanco ke la ĉiutaga vivtenado de la laborforto kostas nur duonan tagon, kvankam la laborforto povas efiki, labori tutan tagon, ke do la valoro, kiun ĝia uzado dum unu tago kreas, estas duoble pli granda ol ĝia propra tagvaloro, estas aparta bonŝanco por la aĉetanto, sed tute ne maljusto kontraŭ la vendanto.

Nia kapitalisto antaŭvidis tion, kaj ĝuste tio ridigas lin. La laboristo trovas do en la laborejo la produktadrimedojn necesajn ne nur por seshora, sed por dekduhora laborprocezo. Se 10 funtoj da kotono sorbis 6 laborhorojn kaj transformiĝis en 10 funtojn da fadeno, tiam 20 funtoj da kotono sorbas 12 laborhorojn kaj transformas ilin en 20 funtojn da kotono. Ni rigardu la produkton de la plilongigita laborprocezo. En la 20

funtoj da fadeno nun estas 5 labortagoj konkretigitaj: 4 en la konsumita kvanto de kotono kaj ŝpiniloj, 1 sorbita de la kotono dum la ŝpinado. Sed la oresprimo de 5 labortagoj estas 30 ŝ. aŭ 1 sterlinga pundo 10 ŝ. Jen do la prezo de la 20 funtoj da fadeno. La funto da fadeno kostas nun kiel antaŭe 1 ŝ. 6 d. Sed la valorsumo de la varoj enĵetitaj en la procezon estis 27 ŝ. La valoro de la fadeno estas 30 ŝ. La valoro de la produkto kreskis je $^{1}/_{9}$ super la valoron antaŭpagitan por la produktado. Tiel 27 ŝ transformiĝis en 30 ŝ. Ili naskis plusvaloron de 3 ŝ. La truko fine sukcesis. Mono estas transformita en kapitalon.

La problemo estas ĉiel solvita sen rompi iel la leĝojn de varinterŝanĝo. Ekvivalento estis interŝanĝita kontraŭ ekvivalento. La kapitalisto pagis kiel aĉetanto ĉiun varon je ĝia valoro, kotonon, ŝpinilojn, laborforton. Li faris poste tion kion ĉiu aĉetanto de varoj faras. Li konsumis ilian uzvaloron. La konsumprocezo de la laborforto, kiu estas samtempe produktadprocezo de la varo, rezultis produkton de 20 funtoj da fadeno en valoro de 30 ŝ. La kapitalisto revenas nun al la merkato kaj vendas varon, post esti aĉetinta varon. Li vendas la funton da fadeno je po 1 ŝ. 6 d., neniom super aŭ sub ĝia valoro. Kaj tamen li eltiras 3 ŝilingojn pli el la cirkulado ol li origine enmetis. Tiu ĉi tuta proceduro, la transformado de lia mono en kapitalon, okazas en la cirkuladsfero kaj ne okazas en ĝi; pro la perado de la cirkulado, ĉar pro la aĉeto de la laborforto sur la varmerkato. Ne en la cirkulado, ĉar tiu nur enkondukas la procezon de plivalorigo, kiu okazas en la produktada sfero. Kaj tiel okazas „ĉio plej bone en la plej bona el la eblaj mondoj”[23].

Per tio ke la kapitalisto transformas monon en varojn, kiuj servas kiel konsistiga elemento por nova produkto aŭ kiel faktoroj de la laborprocezo, per tio ke li enkorpigas al ilia kompleta aĵeco vivantan laborforton, li transformas valoron, pasintan, konkretigitan, mortan laboron en kapitalon, en sin mem plivalorigantan valoron, en vivan monstron kiu komencas „labori” kvazaŭ sorĉe.

Se ni komparas la valorigan kaj la plivalorigan[24] procezojn, la plivaloriga procezo estas nenio alia ol valoriga procezo daŭrigata trans certa punkto. Se tiu daŭras nur ĝis la punkto en kiu la valoro de la laborforto pagita de la kapitalo estas anstataŭigita per nova ekvivalento, tiam ĝi estas simpla valorestiga procezo. Se la valorestiga procezo daŭras trans tiu

23 *En la originalo:* „… Und so ist «tout pour le mieux dans le meilleur des mondes possibles»”. (Citaĵo el Voltero: Candide)-vl

24 La esprimoj *(pli)valoriga* kaj *(pli)valorestiga* estas uzataj sinonime. -vl

punkto, tiam ĝi fariĝas plivaloriga procezo.

Se ni krome komparas la valorestigan procezon kun la laborprocezo, tiam tiu lasta konsistas el la utila laboro kiu produktas uzvalorojn. Tiu moviĝo estas ĉi tie konsiderata kvalite, en sia aparta maniero, laŭ celo kaj enhavo. Tiu sama laborprocezo prezentiĝas en la valorestiga procezo nur per sia kvanta flanko. Temas jam nur pri la tempo kiun la laboro bezonas por sia operacio, alivorte pri la daŭro dum kiu laborforto estas utile elspezata. Ĉi tie ankaŭ la varoj, kiuj eniras la laborprocezon, jam ne estas konsiderataj kiel funkcie determinitaj faktoroj de la celkonforme aganta laborforto. Ili kalkuliĝas nur kiel certaj kvantoj de konkretigita laboro. Ĉu jam entenitaj en la produktadrimedoj aŭ aldonita per la laborforto, la laboro kalkuliĝas jam nur laŭ ĝia tempa mezuro. Ĝi estas tiom da horoj, tiom da tagoj ktp.

Kaj krome ĝi kalkuleblas nur tiom kiom la tempo elspezita por la produktado de la uzvaloro estas socie necesa. Tiu kondiĉo entenas plurajn diversajn aspektojn. La laborforto devas funkcii sub normalaj kondiĉoj. Se la ŝpinmaŝino estas la socie reganta laborilo por ŝpinado, tiam oni devas provizi la laboriston ne per ŝpinrado. Anstataŭ normalkvalita kotono li devas ne ricevi fuŝaĵon kiu ĉiumomente ŝiriĝas. En ambaŭ kazoj li konsumus pli ol la socie necesan labortempon por produktado de funto da fadeno, sed tiu superflua tempo ne estigus valoron aŭ monon. Sed la normaleco de la materiaj laborfaktoroj dependas ne de la laboristo, sed de la kapitalisto. Kroma kondiĉo estas la normaleco de la laborforto mem. En la fako en kiu ĝi estas aplikata ĝi devas posedi la mezuman mezuron da lerteco, inteligento kaj rapideco. Nu, nia kapitalisto aĉetis sur la labormerkato laborforton de normala kvalito. Tiu forto devas esti elspezata en la kutima mezuma mezuro de fortostreĉo, kun la socie kutima grado de intenseco. Pri tio atentas la kapitalisto same zorge kiel pri tio ke nenia tempo estu malŝparata sen laboro. Li aĉetis la laborforton por certa daŭro, kaj li insistas pri siaj rajtoj. Li ne volas esti priŝtelita. Fine – kaj por tio la sama sinjoro havas propran punleĝaron – devas ne okazi ajna kontraŭcela konsumo de krudmaterialo kaj de laboriloj, ĉar malŝparita materialo aŭ laborilo estas superflue elspezitaj kvantoj da konkretigita laboro, kiuj do ne enkalkuliĝas kaj ne eniras en la produkton de la valorestigo.[25]

25 Tio estas unu el la cirkonstancoj kiuj karigas la produktadon bazitan sur sklavismo. Tie la laboristo, laŭ la trafa esprimo de la antikvuloj, nur kiel *instrumentum vocale* <voĉhava instrumento>, devas distingiĝi disde la besto kiel *instrumentum semivocale* <duone voĉhava instrumento> kaj la morta laborilo kiel *instrumentum mutum* <muta instrumento>. Sed li mem sentigas al besto kaj laborilo ke li ne estas de ilia speco, sed homo. Li konvinkas sin mem

Oni vidas: la diferenco, antaŭe akirita el la analizo de la varo, inter la laboro kreanta uzvaloron kaj la sama laboro kreanta valoron, montriĝis nun kiel distingo de la du diversaj flankoj de la produktadprocezo.

La produktadprocezo kiel unueco el laborprocezo kaj valorestiga procezo estas produktadprocezo de varoj; kiel unueco de laborprocezo kaj plivaloriga procezo ĝi estas kapitalisma produktadprocezo, kapitalisma formo de varproduktado.

Pli frue ni rimarkigis, ke por la plivaloriga procezo estas tute indiferente ĉu la laboro alproprigata de la kapitalisto estas simpla, socie mezuma laboro aŭ komplika laboro, laboro de pli granda lerteco. La laboro, kiu estas konsiderata pli alta, pli komplika laboro kompare kun la socia mezuma laboro, estas la esprimiĝo de laborforto en kiun eniras pli altaj formadokostoj, kies produktado kostas pli da labortempo kaj kiu havas do pli altan valoron ol la simpla laborforto. Se la valoro de tiu forto estas pli alta, ĝi esprimiĝas do ankaŭ en pli alta laboro kaj do konkretigas sin, en la samaj tempospacoj, en relative pli altaj valoroj. Sed kio ajn estas la grada

---

kun granda kontentiĝo ke li estas alispeca estulo, per tio ke li fitraktas ilin *con amore*. Pro tio estas ekonomia principo en tiu produktadmaniero, apliki nur la plej krudajn, plej pezajn, sed ĝuste pro sia pezaĉeco malfacile rompeblajn laborilojn. Pro tio, ĝis la eksplodo de la interna milito oni trovis en la [usonaj] sklavismaj ŝtatoj ĉe la golfo de Meksiko plugilojn de malnovĉina konstrumodelo, kiuj levas la grundon simile al porko aŭ talpo, sed kiuj ne fendas kaj turnas ĝin. Kp. J. E. Cairnes, „The Slave Power”, Londono, 1862, p. 46 sj. En sia „Seaboard Slave States” [p. 46] Olmsted rakontas i.a.: „Oni montris al mi ĉi tie laborilojn kiujn ĉe ni neniu normala homo trudus al sia laboristo al kiu li pagas salajron. Ilia eksterordinara pezo kaj plumpeco igas la laboron, laŭ mia opinio, almenaŭ je 10 elcentoj pli malfacila ol per la iloj uzataj ĉe ni. Sed kiel oni asertis al mi, ĉe la senzorga kaj kruda maniero, en kiu la sklavoj ŝajne uzas ilin, ne eblas konfidi al ili pli malpezajn aŭ malpli krudajn ilojn; tiaj iloj, kiajn ni konstante, kaj bonprofite por ni, konfidas al niaj laboristoj, sur grenkampo en Virginio eltenus eĉ ne unu tagon – kvankam la grundo estas pli malpeza kaj pli senŝtona ol la nia. Oni ankaŭ donis al mia demando, kial en la farmbienoj oni tiel ĝenerale anstataŭigas ĉevalojn per muloj, kiel unuan kaj koncedite decidan kialon, ke ĉevaloj ne eltenas la traktadon kiujn ili konstante kaj devige ricevas de la nigruloj. Ĉevalojn ili post mallonga tempo lamigas kaj bate kripligas, dum muloj eltenas la batojn kaj la jen kaj jen okazantan mankon de unu aŭ du nutradoj, sen korpe difektiĝi. Ili ankaŭ ne malvarmumiĝas kaj ne malsaniĝas kiam ili estas neglektataj kaj tro laborigataj. Sed mi tute ne bezonas iri pli ol ĝis la fenestro de la ĉambro en kiu mi skribas por vidi preskaŭ ĉiumomente traktadon de bruto kiu certe ĉe ĉiu farmisto en la nordo kondukus al tuja maldungo de la kondukanto.”

diferenco inter ŝpinlaboro kaj juvelista laboro, la porcio da laboro per kiu la juvelisto anstataŭigas nur la valoron de sia propra laborforto, neniel distingiĝas de la aldona porcio da laboro, en kiu li kreas plusvaloron. Nun kiel antaŭe la plusvaloro venas nur el kvanta pluso da laboro, per la longigita daŭro de tiu sama laborprocezo, en unu kazo la procezo de la fadenproduktado, en la alia kazo la procezo de juvelproduktado.[26]

Aliflanke, en ĉiu valorestiga procezo la pli alta laboro estas ĉiam reduktenda al socia mezuma laboro, ekz-e unu tago de pli alta laboro al x tagoj da simpla laboro.[27]

26 La diferenco inter pli alta kaj simpla laboro, „skilled” kaj „unskilled labour”, baziĝas parte sur nuraj iluzioj aŭ almenaŭ diferencoj kiuj delonge ĉesis esti realaj kaj plu vivas jam nur en tradicia konvencio; parte sur la pli senhelpa situacio de certaj tavoloj de la laborista klaso, kiu ebligas al ili malpli ol al aliaj, elbatali la valoron de sia laborforto. Hazardaj cirkonstancoj ludas ĉe tio tiom grandan rolon ke la samaj laborspecoj interŝanĝas la lokon. Kie ekz-e la korpa substanco de la laborista klaso malfortiĝis kaj relative elĉerpiĝis, kiel en ĉiuj landoj de evoluinta kapitalisma produktado, brutalaj laboroj, kiuj kostas multan muskolforton, ĝenerale transformiĝas en pli altan, kontraste al multe pli fajnaj laboroj kiuj sinkas al la ŝtupo de simpla laboro, kiel ekz-e la laboro de masonisto (brick layer) en Anglio okupas multe pli altan ŝtupon ol tiu de damasko-teksisto. Aliflanke la laboro de kotonvelurtranĉisto (fustian cutter), kvankam ĝi kostas multan korpan streĉiĝon kaj estas krome tre malsaniga, estas konsiderata „simpla” laboro. Cetere oni ne imagu ke la tiel nomata „skilled labour” okupas kvante gravan amplekson en la nacia laboro. Laing kalkulas, ke en Anglio (kaj Kimrio) la ekzistado de pli ol 11 milionoj baziĝas sur simpla laboro. Post subtraho de unu miliono da aristokratoj kaj miliono kaj duono da paŭperuloj, vagabondoj, krimuloj, prostituitinoj ktp el la 18 milionoj de la loĝantaro, tempe de lia skribo, restas 4.650.000 de la meza klaso inkluzive de etrentuloj, oficistoj, verkistoj, artistoj, instruistoj ktp. Por atingi tiujn $4^{2}/_{3}$ milionojn, li kalkulas al la laboranta parto de la meza klaso, krom bankistojn ktp, ĉiujn pli bone pagatajn „fabriklaboristojn”! Ankaŭ la masonistoj ne mankas inter la „potencigitaj laboristoj”. Poste restas al li la menciitaj 11 milionoj. (S. Laing, „National Distress etc.”, Londono, 1844, [p. 49-52 divl.) „La granda klaso kiu povas doni por sia nutriĝo nenion alian ol ordinaran laboron, estas la granda amaso de la popolo.” (James Mill en artikolo „Colony”, „Supplement to the Encyclop. Brit.”, 1831)

27 „Kie oni parolas pri laboro kiel mezuro de la valoro, oni komprenas per ĝi nepre laboron de certa speco … la rilato, en kiu la aliaj laboroj staras en ĝi, estas facile eltrovebla.” ([J. Cazenove,] „Outlines of Polit. Economy”, Londono, 1832, p. 22, 23)

# *SESA ĈAPITRO – Konstanta kapitalo kaj varia kapitalo*

La diversaj faktoroj de la laborprocezo partoprenas en diversa mezuro en la estigo de la produktvaloro.

La laboristo aldonas al la laborobjekto novan valoron per aldono de certa kvanto da laboro, sendepende de determinitaj enhavo, celo kaj teĥnika karaktero de sia laboro. Aliflanke ni retrovas la valorojn de la konsumitaj produktadrimedoj kiel konsistajn partojn de la produkt-valoro, ekz-e la valorojn de kotono kaj ŝpinilo en la fadenvaloro. La valoro de la produktadrimedoj konserviĝas do per sia transiĝo al la produkto. Tiu transiĝo okazas dum la transformado de la produktadrimedoj en produkton, en la laborprocezo. La laboro peras ĝin. Sed kiel?

La laboristo ne laboras duoble en la sama tempo, ne unufoje por aldoni al la kotono valoron per sia laboro, kaj kroman fojon por konservi ĝian malnovan valoron, aŭ, kio estas la samo, por transdoni la valoron de la kotono, kiun li transformas, kaj de la ŝpinilo, per kiu li laboras, al la produkto, la fadeno. Sed per nura aldonado de nova valoro li konservas la malnovan valoron. Sed ĉar la aldono de nova valoro al la laborobjekto kaj la konservado de la malnovaj valoroj en la produkto estas du tute diversaj rezultoj, kiujn la laboristo okazigas en la sama tempo, kvankam li laboras nur unufoje en la sama tempo, tiu duflankeco de la rezulto klarigeblas evidente nur el la duflankeco de lia laboro mem. En la sama momento ĝi devas en unu kvalito krei valoron kaj en la alia kvalito konservi aŭ transdoni valoron.

Kiel ĉiu laboristo aldonas labortempon kaj do valoron? Ĉiam nur en la formo de sia aparte produktiva labormaniero. La ŝpinisto aldonas labortempon per ŝpinado, la teksisto per teksado, la forĝisto per forĝado. Sed per la celorientita formo, en kiu ili entute aldonas laboron kaj do novvaloron, per ŝpinado, teksado, forĝado, la produktadrimedoj, kotono kaj ŝpinilo, fadeno kaj teksilo, fero kaj amboso, fariĝas konsistigaj elementoj de produkto, de nova uzvaloro.[28] La malnova formo de ĝia uzvaloro pereas, sed nur por eniri en novan formon de uzvaloro. Sed ĉe rigardo de la valoriga procezo montriĝis ke, en la mezuro laŭ kiu uzvaloro estas eluzata por produktado de nova uzvaloro, la labortempo necesa por produktado de la eluzita uzvaloro fariĝas parto de la labortempo necesa por produktado de la nova uzvaloro, do ke ĝi estas labortempo transigata el la eluzita

---

28 „Laboro rezultigas novan kreaĵon anstataŭ la neniigitan.” („An Essay on the Polit. Econ. of Nations”, Londono, 1821, p. 13)

produktadrimedo al la nova produkto.

La laboristo do konservas la valorojn de la eluzataj produktadrimedoj aŭ transigas ilin kiel valorkonsistaĵoj al la produkto, ne per aldonado de laboro entute, sed per la aparte utila karaktero, per la specife produktiva formo de tiu aldona laboro. Kiel tia celorientita produktiva agado, ŝpinado, teksado, forĝado, la laboro revivigas per sia nura kontakto la mortajn produktadrimedojn, faras ilin vivantaj faktoroj de la laborprocezo kaj ligiĝas kun ili fariĝante novaj[29] produktoj.

Se la specifa produktiva laboro de la laboristo ne estus ŝpinado, tiam li ne transformus la kotonon en fadenon, do ankaŭ ne transigus la valorojn de kotono kaj de ŝpinilo sur la fadenon. Sed se aliflanke la sama laboristo ŝanĝas sian metion kaj fariĝas lignaĵisto, tiam li nun kiel antaŭe aldonas per labortago valoron al sia materialo. Li do aldonas ĝin per sia laboro, ne kiel ŝpinlaboro aŭ lignaĵista laboro, sed kiel abstrakta, socia laboro entute, kaj li aldonas certan valorgrandon, ne ĉar lia laboro havas apartan utilan enhavon, sed ĉar ĝi daŭras certan tempon. Do, laboro de la ŝpinisto aldonas novan valoron al la valoroj de kotono kaj ŝpinilo, en sia abstrakta, ĝenerala eco, kiel elspezo de homa laborforto, kaj aliflanke en sia konkreta, aparta, utila eco kiel senchava procezo, li transdonas la valoron de tiuj produktadrimedoj al la produkto kaj tiel konservas ilian valoron en la produkto. Pro tio la duflankeco de ĝia rezulto en la sama momento.

Per la nur kvanta aldono de laboro aldoniĝas nova valoro, per la kvalito de la aldonata laboro la malnovaj valoroj de la produktadrimedoj estas konservataj en la produkto. Tiu duflanka efiko de la sama laboro pro ties duflankeco montriĝas palpeble ĉe diversaj fenomenoj.

Supozu ke ia inventaĵo ebligus al la ŝpinisto ŝpini en 6 horoj tiom da kotono kiom antaŭe en 36 horoj. Kiel celorientita utila, produktiva agado lia laboro sesobligus sian forton. Ĝia produkto estas sesobla, 36 anstataŭ 6 funtoj da fadeno. Sed la 36 funtoj da kotono ensuĉas nun nur tiom da labortempo kiom antaŭe 6 funtoj. Sesoble malpli da nova laboro estas aldonata al ĝi ol per la malnova metodo, pro tio jam nur sesono de la antaŭa valoro. Aliflanke nun ekzistas la sesobla valoro de kotono en la produkto, en la 36 funtoj da fadeno. En la 6 ŝpinhoroj estas sesoble pli granda valoro de krudmaterialo entenata kaj transigata al la produkto, kvankam al la sama krudmaterialo estas aldonata sesoble malpli granda novvaloro. Tio montras, kiel la eco, per kiu la laboro dum la sama nedividebla procezo konservas valorojn, estas esence distingenda de la

29 „novaj” estas aldono de la angla versio. -vl

eco per kiu ĝi kreas valorojn. Ju pli da necesa labortempo dum la ŝpinado aplikiĝas al la sama kvanto da kotono, des pli granda la novvaloro aldonata al la kotono, sed ju pli da funtoj da kotono estas ŝpinataj en la sama labortempo, des pli granda estas la malnova valoro konservata en la produkto.

Supozu inverse, ke la produktivo de la ŝpinlaboro restas senŝanĝa, ke la ŝpinisto bezonas do nun kiel antaŭe same multan tempon por transformi unu funton da kotono en fadenon. Sed la interŝanĝvaloro de la kotono ŝanĝiĝu, la prezo de unu funto da kotono kresku aŭ malkresku sesoble. En ambaŭ kazoj la ŝpinisto daŭre aldonas al la sama kvanto da kotono la saman labortempon, do la saman valoron, kaj en ambaŭ kazoj li produktas en la sama tempo same multan fadenon. Tamen la valoro, kiun li transdonas de la kotono al la fadeno, estas jen sesoble pli malgranda, jen sesoble pli granda ol antaŭe. Same, se la laborrimedoj kariĝas aŭ malkariĝas, sed ĉiam faras la saman servon en la laborprocezo.

Se la teĥnikaj kondiĉoj de la ŝpinprocezo restas senŝanĝaj kaj ankaŭ okazas nenia ŝanĝo pri la produktadrimedoj, tiam la ŝpinisto nun kiel antaŭe konsumas en samaj labortempoj samajn kvantojn da krudmaterialo kaj maŝinaro de samaj valoroj. La valoro, kiun li konservas en la produkto, staras tiam en inversa proporcio al la novvaloro kiun li aldonas. En du semajnoj li aldonas duoble pli da laboro ol en unu semajno, do duoble da valoro, kaj samtempe li konsumas duoble pli da maŝinaro de duoble pli da valoro, do konservas en la dusemajna produkto duoble pli da valoro ol en la produkto de unu semajno. Sub donitaj kaj senŝanĝaj produktadkondiĉoj la laboristo konservas des pli da valoro, ju pli da valoro li aldonas, sed li ne konservas pli da valoro ĉar li aldonas pli da valoro, sed ĉar li aldonas ĝin sub senŝanĝaj kondiĉoj sendependaj de lia propra laboro.

Tamen direblas en relativa senco, ke la laboristo konservas malnovajn valorojn ĉiam en la sama proporcio en kiu li aldonas novvaloron. Ĉu la kotonprezo kreskas de 1 ŝ. al 2 ŝ. aŭ malkreskas al 6 d., li konservas en la produkto de unu horo ĉiam nur duone da kotonvaloro, kiom ajn li ŝanĝas, ol en la produkto de du horoj. Se krome la produktivo de lia propra laboro kreskas aŭ falas, tiam li ŝpinas ekz-e en unu laborhoro pli aŭ malpli da kotono ol antaŭe, kaj laŭ tio konservas pli aŭ malpli da kotonvaloro en la produkto de unu laborhoro. Ĉiel li konservas en du laborhoroj duoble da valoro ol en unu laborhoro.

Valoro, krom en sia nur simbola prezentiĝo en valorsigno, ekzistas en uzvaloro, en aĵo. (La homo mem, konsiderata kiel nura ekzisto de labor-

forto, estas naturobjekto, aĵo, kvankam vivanta, memkonscia aĵo, kaj la laboro mem estas la aĵa esprimiĝo de tiu forto.) Se do la uzvaloro perdiĝas, tiam perdiĝas ankaŭ la valoro. La produktadrimedoj perdas kun sia uzvaloro ne samtempe sian valoron, ĉar ili perdas per la laborprocezo la originan formon de sia uzvaloro efektive nur por akiri en la produkto la formon de alia uzvaloro. Sed kiom gravas por la valoro ekzisti en ia uzvaloro, tiom egalas en kiu ĝi ekzistas, kiel la metamorfozo de la varoj montras. El tio sekvas, ke en la laborprocezo valoro transiras de la produktadrimedo al la produkto nur tiom kiom la produktadrimedo perdas kun sia memstara uzvaloro ankaŭ sian interŝanĝvaloron. Ĝi transdonas nur tiun valoron al la produkto, kiun ĝi perdas kiel produktadrimedo. Sed la aĵaj faktoroj de la laborprocezo kondutas tiurilate diversmaniere.

La karbo, per kiu la maŝino hejtiĝas, malaperas senspure, same la oleo per kiu oni ŝmiras la akson de la rado ktp. Farbo kaj aliaj helpmaterialoj malaperas, sed montriĝas en la ecoj de la produkto. La krudmaterialo konsistigas la substancon de la produkto, sed ŝanĝis sian formon. Krudmaterialo kaj helpmaterialoj perdas do la memstaran formon per kiu ili eniris la laborprocezon kiel uzvaloroj. Alie okazas kun la veraj helpiloj. Instrumento, maŝino, fabrikkonstruaĵo, ujo ktp servas en la laborprocezo nur tiom longe kiom ili konservas sian originan formon kaj morgaŭ ree eniras samforme en la laborprocezon kiel hieraŭ. Tiel, kiel ili dum sia vivo, la laborprocezo, konservas sian memstaran formon kontraŭ la produkto, tiel ankaŭ post sia morto. La kadavroj de maŝinoj, iloj, laborkonstruaĵoj ktp ekzistas daŭre disaj de la produktoj kiujn ili helpis formiĝi. Se ni rigardas nun la tutan periodon dum kiu tia laborrimedo servas, ekde la tago de ĝia eniro en la laborejon ĝis la tago de ĝia forigo en la rubejon, tiam dum tiu periodo ĝia uzvaloro estis komplete konsumita fare de la laboro kaj ĝia interŝanĝvaloro komplete transigita al la produkto. Se ŝpinmaŝino finas sian vivon ekz-e en 10 jaroj, tiam ĝia ĉiomvaloro transiris dum la dekjara laborprocezo al la dekjara produkto. La vivperiodo de laborrimedo ampleksas do pli aŭ malpli grandan nombron da ĉiam denove ripetataj laborprocezoj. Kaj al la laborrimedo okazas kiel al la homo. Ĉiu homo formortadas ĉiutage je 24 horoj. Sed oni ne precize vidas ĉe la homo, je kiom da tagoj li jam mortadis. Tio tamen ne malhelpas vivasekurajn societojn tiri el la mezuma vivo de la homoj tre certajn, kaj kio estas ankoraŭ multe pli grava por ili, tre profitigajn konkludojn. Kaj kiel al la homo, tiel okazas al la laborrimedo. Oni scias el sperto, kiom longe laborrimedo, ekz-e maŝino de ia speco, mezume eltenas. Ni supozu ke ĝia uzvaloro daŭras en la laborprocezo nur 6 tagojn. Tiam ĝi perdas mezume dum ĉiu labortago $^1/_6$ da sia uzvaloro kaj transdonas do $^1/_6$ da sia valoro al

la ĉiutaga produkto. Tiamaniere kalkuliĝas la eluziĝo de ĉiuj laborrimedoj, do ekz-e ilia ĉiutaga perdo de uzvaloro kaj ilia ĉiutaga valortransdono al la produkto.

Tiel montriĝas konvinke, ke produktadrimedo neniam transdonas pli da valoro al la produkto ol ĝi perdas en la laborprocezo per neniigo de ĝia propra uzvaloro. Se ĝi ne havus perdeblan valoron, t.e. se ĝi ne estus mem produkto de homa laboro, tiam ĝi ne transdonus valoron al la produkto. Ĝi servus kiel estiganto de uzvaloro, sen servi kiel estiganto de interŝanĝvaloro. Tio veras por ĉiuj produktadrimedoj kiuj ekzistas nature, sen homa interveno, por tero, vento, akvo, fero en la ercvejno, ligno de la praarbaro ktp.

Ĉi tie ni renkontas alian fenomenon. Ni supozu ke iu maŝino valoras ekz-e 1.000 sterlingajn pundojn kaj eluziĝas en 1.000 tagoj. En tiu kazo ĉiutage $^{1}/_{1.000}$ de la valoro de la maŝino transiras al ĝia ĉiutaga produkto. Samtempe, kvankam kun malkreskanta vivforto, la tuta maŝino ĉiam efikas en la laborprocezo. Montriĝas do, ke faktoro de la laborprocezo, nome produktadrimedo, eniras tute en la laborprocezon, sed nur parte en la valorestigan procezon. La diferenco inter laborprocezo kaj valorestiga procezo speguliĝas ĉi tie ĉe iliaj aĵaj faktoroj, per tio ke la sama produktadrimedo kalkuleblas kiel elemento de la laborprocezo komplete kaj kiel elemento de la valorestigo nur po-pece en la sama laborprocezo.[30]

30 Ĉi tie ne temas pri riparoj de la laborrimedoj, maŝinoj, konstruaĵoj ktp. Maŝino riparata ne funkcias kiel laborrimedo sed kiel labormaterialo. Oni ne laboras per ĝi, sed ĝi estas mem prilaborata, por ripari ĝian uzvaloron. Por nia celo, ĉiam eblas pense inkludi tiajn riparlaborojn en la laboron necesan por produktado de la laborrimedo. En la teksto temas pri la eluziĝo, kiun nenia kuracisto povas kuraci kaj kiu iom post iom kondukas al la morto; temas pri „tia eluziĝo, kiun ne eblas de tempo al tempo anstataŭigi kaj kiu transigas ekzemple tranĉilon fine en tian staton ke la tranĉilfaristo diras, ke ĝi jam ne valoras novan klingon". Oni vidis en la teksto, ke maŝino ekz-e eniras tute en ĉiun individuan laborprocezon, sed nur po-pece en la samtempan valorestigan procezon. Laŭ tio juĝendas la sekva konfuzo de nocioj: „Ricardo parolas pri la laborkvanto de maŝinkonstruisto elspezita ĉe konstruado de ŝtrumpfara maŝino", entenata ekz-e en la valoro de paro da ŝtrumpoj. „Tamen la tuta laboro, kiu produktis ĉiun paron da ŝtrumpo … inkludas la tutan laboron de la maŝinkonstruisto kaj ne nur parton; ĉar la maŝino faras ja multajn parojn, sed neniu el tiuj paroj produkteblis sen ia parto de la maŝino." („Observations on certain verbal disputes in Pol. Econ., particularly relating to Value, and to Demand and Supply", Londono, 1821, p. 54) La aŭtoro, eksterordinare orgojla saĝŝajnulo, pravas kun sia konfuzo kaj do kun sia polemiko nur tiom, ke nek Ricardo nek ia ajn alia ekonomikisto, antaŭ aŭ post li, precize distingis la du

Aliflanke, produktadrimedo inverse povas eniri komplete en la valorestigan procezon, kvankam nur po-pece en la laborprocezon. Supozu ke dum ŝpinado de la kotono ĉiutage el 115 funtoj perdiĝas 15 funtoj, kiuj ne fariĝas fadeno, sed kotonpolvo. Tamen, se tiu defalaĵo de 15 funtoj estas normala, nedisigebla de la mezuma transformado de la kotono, tiam la valoro de la 15 funtoj de tiu kotono, kiuj ne fariĝas elemento de la fadeno, eniras tute same en la fadenvaloron kiel la valoro de la 100 funtoj kiuj konsistigas ĝian substancon. La uzvaloro de 15 funtoj da kotono devas polviĝi por fari 100 funtojn da fadeno. La pereo de tiu kotono estas do produktadkondiĉo de la fadeno. Ĝuste pro tio ĝi transdonas sian valoron al la fadeno. Tio veras por ĉiuj ekskrementoj de la laborprocezo, almenaŭ en la grado en kiu tiuj ekskrementoj ne faras siavice novajn produktadrimedojn kaj do novajn memstarajn uzvalorojn. Tiel oni vidas en la grandaj maŝinfabrikoj de Manĉestro montojn da ferdefalaĵoj, kvazaŭ rabotaĵoj deŝeligitaj de ciklopecaj maŝinoj, vespere migri sur grandaj ĉaroj el la fabriko en la fergisejon, por sekvatage kiel masiva fero remigri el la fergisejo en la fabrikon.

Nur tiom, kiom produktadrimedoj dum la laborprocezo perdas sian valoron en formo de siaj malnovaj uzvaloroj, ili transigas valoron al la nova formo de la produkto. La maksimuma valorperdo kiun ili povas suferi en la laborprocezo estas evidente limigita de la origina valorgrando kun kiu ili eniras la laborprocezon, aŭ de la labortempo necesa por ilia propra produktado; pro tio, produktadrimedoj povas aldoni al la produkto neniam pli da valoro ol ili posedas sendepende de la laborprocezo al kiu ili servas. Kiom ajn utila estas labormaterialo, maŝino, produktadrimedo: se ĝi kostas 150 sterlingajn pundojn, do ni diru 500 labortagojn, tiam ĝi aldonas al la ĉioma produkto, al kies estigo ĝi servas, neniam pli ol 150 sterlingajn pundojn. Ĝia valoro estas determinita ne de la laborprocezo, en kiun ĝi eniras kiel produktadrimedo, sed de la laborprocezo el kiu ĝi venas kiel produkto. En la laborprocezo ĝi servas nur kiel uzvaloro, kiel aĵo kun utilaj ecoj, kaj ne transdonus valoron al la produkto se ĝi ne havintus valoron antaŭ sia eniro en la procezon.[31]

---

flankojn de la laboro, kaj pro tio ankoraŭ malpli analizis ilian diversan rolon en la valorestigo.

31 Oni komprenas do la absurdecon de la teda J. B. Say, kiu volas dedukti la plusvaloron (interezon, profiton, renton) el la *„produktivaj servoj”* kiujn la produktadrimedoj, tero, instrumentoj, ledo ktp faras per siaj uzvaloroj en la laborprocezo. S-ro Wilhelm Roscher, kiu ne facile preterlasas registri presite tiajn apologiajn ideojn, elkrias: „Tre ĝuste J. B. Say rimarkigas („Traîté”, vol. I, ĉ. 4): ke la valoro estigita de olemuelilo, post subtraho de ĉiuj kostoj, estas

Per tio ke la produktiva laboro transformas produktadrimedojn en konsistigajn partojn de nova produkto, al ties valoro okazas animmigrado[32]. La valoro transiras el la konsumita korpo en la nove formitan korpon. Sed tiu animmigrado okazas kvazaŭ malantaŭ la dorso de la reala laboro. La laboristo ne povas aldoni novan laboron, do ne krei novan valoron, sen konservi malnovajn valorojn, ĉar li devas aldoni la laboron ĉiam en certa utila formo, kaj li ne povas aldoni ĝin en utila formo sen fari produktojn novaj produktadrimedoj de nova produkto kaj per tio transigi ilian valoron al la nova produkto. Estas do naturtalento de la aganta laborforto, de la vivanta laboro, konservi valoron per tio ke ĝi aldonas valoron, naturtalento kiu kostas nenion al la laboristo, sed kiu enspezigas multon al la kapitalisto, la konservado de ekzistanta kapital-valoro.[33] Tiom longe, kiom la aferoj fluas, la kapitalisto estas tro enprofundiĝinta en la plusfarado por vidi tiun senpagan talenton de la laboro. Violentaj interrompoj de la laborprocezo, krizoj, senteble atentigas lin pri ĝi.[34]

ja io nova, io esence alia ol la laboro, per kiu la olemuelilo mem estis kreita.” (l.c., p. 82, noto) Tre ĝuste! La „oleo” produktita de la olemuelilo estas io tute alia ol la laboro kiun la konstruado de la muelilo kostas. Kaj sub „valoro” s-ro Roscher komprenas ion tian kiel „oleon”, ĉar „oleo” havas valoron, sed „en la naturo” troviĝas ŝtonoleo [petrolo -vl], kvankam relative ne „tre multe”. Tion ŝajne celas lia alia rimarko: „Interŝanĝvalorojn ĝi (la naturo!) preskaŭ tute ne estigas.” [l.c., p. 79] Al la naturo de Roscher okazas kiel al la malsaĝa virgulino, kiu fine ja konfesis ke ŝi naskis infanon, sed kiu „estis tute eta”. La sama „klerulo” („savant sérieux) rimarkigas ankoraŭ ĉe la supre menciita okazo: „La skolo de Ricardo kutimas inkludi ankaŭ la kapitalon en la nocion de laboro, kiel «ŝpare akumulitan» laboron. Tio estas mallertaĵo (!), ĉar (!) ja (!) la kapitalposedanto (!) faris tamen (!) pli (1) ol la nuran (?!) estigon (?) kaj (??) konservadon de tiu (de kiu?): ĝuste (?!?) la sindetenemo je propra ĝuo, por kiu li ekz-e (!!!) postulas interezojn.” (l.c. [, p. 82]) Kia „lertaĵo”!, tiu „anatomia-fiziologia metodo” de la politika ekonomio, kiu disvolvas el nura „deziro” ja tamen ĝuste „valoron”.

32 Reinkarniĝo. -vl

33 „El ĉiuj helprimedoj en kampkulturado, la laboro de la homo … estas tiu, de kiu la farmisto plej dependas por anstataŭigo de sia kapitalo. La du aliaj – la havaĵo de laborbrutoj kaj la … ĉaro, plugiloj, ŝpatoj ktp – estas nenio sen certa kvanto de la unua.” (Edmund Burke, „Thoughts and Details on Scarcity, originally presented to the Rt. Hon. W. Pitt in the Month of November 1795”, eld. Londono, 1800, p. 10)

34 En la „Times” de la 26-a de novembro 1862, fabrikisto, kies ŝpinejo laborigas 800 laboristojn kaj konsumas ĉiusemajne mezume 150 pakaĵojn da usona kotono, lamentas al la publiko la jarajn kostojn de laborinterrompo de sia

Tio, kio ĝenerale el la produktadrimedoj estas konsumata, estas ilia uzvaloro, per kies konsumo la laboro estigas produktojn. Ilia valoro estas efektive ne konsumata,[35] do ankaŭ ne povas esti reproduktata. Ĝi estas konservata, sed ne ĉar operacio okazas al ĝi mem en la laborprocezo, sed ĉar la uzvaloro, en kiu ĝi origine ekzistas, ja malaperas, sed malaperas nur en alian uzvaloron. La valoro de la produktadrimedoj do reaperas en la produkto, sed ĝi estas, precize dirite, ne reproduktita. Tio, kio estas produktata, estas la nova uzvaloro, en kiu la malnova interŝanĝvaloro reaperas.[36]

Alie statas pri la subjektiva faktoro de la laborprocezo, la aganta laborforto. Dum la laboro, per sia celorientita formo, transigas kaj konservas la valoron de la produktadrimedoj al la produkto, ĉiu elemento de ĝia moviĝo estigas kroman valoron, novvaloron. Ni supozu ke la produktadproce-

---

fabriko. Li taksas ilin je 6.000 sterlingaj pundoj. Inter tiuj kostoj troviĝas multaj sumoj kiuj ĉi tie ne koncernas nin, ekz-e grundrento, impostoj, asekurpagoj, salajro por jare dungitaj laboristoj, manaĝeroj, librotenistoj, inĝenieroj ktp. Sed poste li listigas 150 sterlingajn pundojn por karbo por varmigi la fabrikon de tempo al tempo kaj por iam kaj tiam funkciigi la vapormaŝinon, krome salajrojn por laboristoj kiuj per okaza laboro konservas la maŝinaron en funkcikapabla stato. Fine 1.200 sterlingajn pundojn pro malboniĝo de la maŝinaro, ĉar „la vetero kaj la naturaj kaŭzoj de malboniĝo ne ĉesas sian efikadon pro tio ke la vapormaŝino ĉesas turniĝi”. Li eksplicite rimarkigas ke tiu sumo de 1.200 sterlingaj pundoj estas taksita tiom malalta ĉar la maŝinaro troviĝas jem en tre eluzita stato.

35 „Produktiva konsumo: kie la konsumo de varo estas parto de la produktadprocezo … En tiuj okazoj ne okazas konsumo de valoro.” (S. P. Newman, l.c., p. 296)

36 En usona manlibro, kiu ricevis eble 20 eldonojn, oni legas: „Ne gravas en kiu formo la kapitalo reaperas.” Post multvorta nombrado de ĉiaj eblaj produktadingrediencoj, kies valoro reaperas en la produkto, ĝi diras fine: „La diversaj specoj de nutraĵo, vestaĵo kaj hejmo, kiuj necesas por la ekzistado kaj la komforto de la homo, estas ankaŭ ŝanĝataj. Ili estas de tempo al tempo konsumitaj, kaj ilia valoro reaperas en nova forto, kiujn ili donas al liaj korpo kaj spirito, kaj tiel formas novan kapitalon, kiu siavice estas aplikata en la produktadprocezo.” (F. Wayland, l.c., p. 31, 32) Aparte de ĉiuj ceteraj strangaĵoj, ne estas la prezo de la pano kiu reaperas en la renovigita forto, sed ĝiaj sangogeneraj substancoj. Sed kio aliflanke reaperas en la valoro de la forto, estas ne la vivrimedoj, sed ilia valoro. La samaj vivrimedoj, eĉ se ili kostas nur la duonon, produktas tute same multe da muskolo, osto ktp, do la saman forton, sed ne forton de sama valoro. Tiu transmeto de „valoro” en „forton” kaj la tuta hipokrita malprecizeco kaŝas la tamen vanan provon eltordi ian plusvaloron el nura reapero de antaŭdonitaj valoroj.

zo ĉesas ĉe la punkto, en kiu la laboristo estas produktinta ekvivalenton por la valoro de sia propra laborforto, per seshora laboro aldoninta valoron de ekz-e 3 ŝ. Tiu valoro estas la kromaĵo de la produktvaloro super ĝiaj konsistaĵoj ŝuldataj al la valoro de la produktadrimedoj. Ĝi estas la sola originala valoro estiĝinta ene de tiu procezo, la sola valor-parto de la produkto produktita per la procezo mem. Tamen ĝi anstataŭigas nur la monon antaŭpagitan de la kapitalisto ĉe la aĉeto de la laborforto kaj elspezita de la laboristo mem por vivrimedoj. Koncerne la elspezitajn 3 ŝ., la novvaloro de 3 ŝ. aperas nur kiel reproduktado. Sed ĝi estas reale produktita, ne nur ŝajne, kiel la valoro de la produktadrimedoj. La anstataŭigo de valoro per alia estas ĉi tie perata de nova valorestigo.

Sed ni jam scias ke la laborprocezo daŭras pli longe ol ĝis tiu punkto kie nura ekvivalento por la valoro de la laborforto estus reproduktita kaj aldonita al la laborobjekto. Anstataŭ la 6 horoj, kiuj sufiĉas por tio, la procezo daŭras ekz-e 12 horojn. Per la agado de la laborforto do ne nur ĝia propra valoro estas reproduktata, sed kroma valoro produktata. Tiu plusvaloro konsistigas la kromaĵon de la produktvaloro super la valoro de la konsumitaj produktestigaj elementoj, t.e. de la produktadrimedoj kaj la laborforto.

Per tio ke ni prezentis la diversajn rolojn kiujn la diversaj faktoroj de la laborprocezo ludas en la estigo de la produktvaloro, ni karakterizis efektive la funkciojn de la diversaj elementoj de la kapitalo en ĝia propra valoriga procezo. La kromaĵo de la ĉiomvaloro de la produkto super la valorsumo de ĝiaj konsistigaj elementoj estas la kromaĵo de la plivalorigita kapitalo super la origine antaŭpagita kapitalvaloro. Produktadrimedoj unuflanke, laborforto aliflanke estas nur la diversaj ekzistadformoj kiujn la origina kapitalvaloro alprenis ĉe demeto de sia monformo kaj sia transformiĝo en la faktorojn de la laborprocezo.

La parto de la kapitalo do, kiu transformiĝas en produktadrimedojn, t.e. en krudmaterialon, helpmaterialon kaj laborrimedojn, ne ŝanĝas sian valorgrandon en la produktadprocezo. Mi nomas ĝin do konstanta kapital-parto, aŭ pli mallonge: konstanta kapitalo.

La parto de la kapitalo transformita en laborforton, male, ŝanĝas sian valoron en la produktadprocezo. Ĝi reproduktas sian propran ekvivalent-on kaj kromaĵon, la plusvaloron, kiu povas siavice ŝanĝiĝi, esti pli granda aŭ malpli granda. El konstanta grando tiu parto de la kapitalo konstante transformiĝas en variantan. Mi nomas ĝin do varia kapitalparto, aŭ pli mallonge: varia kapitalo. La samaj kapitalpartoj, kiuj el la vidpunkto de la

laborprocezo distingiĝas kiel objektivaj kaj subjektivaj faktoroj, kiel produktadrimedoj kaj laborforto, distingiĝas el vidpunkto de la plivalorigprocezo kiel konstanta kapitalo kaj varia kapitalo.

La nocio de konstanta kapitalo neniel ekskludas valorŝanĝon de siaj konsistigaj partoj. Ni supozu ke la funto da kotono kostas hodiaŭ 6 d. kaj kreskas morgaŭ, pro perdo de kotonrikolto, al 1 ŝ. La malnova kotono, kiu daŭre prilaboratas, estis aĉetita je la valoro de 6 d., sed aldonas nun al la produkto valorparton de 1 ŝ. Kaj la jam ŝpinita, ebla jam kiel fadeno surmerkate cirkulanta kotono ankaŭ aldonas al la produkto la duoblon de sia origina valoro. Sed oni vidas, ke tiaj valorŝanĝoj estas sendependaj de la valorigo de la kotono en la ŝpinprocezo mem. Se la malnova kotono ankoraŭ tute ne estus enirinta en la laborprocezon, tiam ĝi nun revendeblus je 1 ŝ. anstataŭ 6 d. Inverse: Ju malpli da laborprocezoj ĝi estas jam trairinta, des pli certas tiu rezulto. Pro tio estas la leĝo de spekulado, ĉe tiaj valorŝanĝiĝoj spekuli pri krudmaterialo ĉiam en ties malplej prilaborita formo, do prefere je fadeno ol je tolo kaj prefere je kotono mem ol je fadeno. La valorŝanĝo fontas ĉi tie en la procezo kiu produktas kotonon, ne en la procezo en kiu ĝi funkcias kiel produktadrimedo kaj do kiel konstanta kapitalo. La valoro de varo estas ja determinata de la kvanto da laboro entenata en ĝi, sed tiu kvanto mem estas socie determinata. Se la labortempo socie necesa por ĝia produktado ŝanĝiĝis – kaj la sama kvanto da kotono reprezentas en malfavoraj rikoltoj pli grandan kvanton da laboro ol en favoraj –, tiam okazas retroefiko sur la malnova varo, kiu konsidereblas ĉiam nur kiel individua ekzemplero de sia speco[37], kies valoro estas ĉiam mezurata per socie necesa, do ankaŭ ĉiam sub aktualaj sociaj kondiĉoj necesa laboro.

Kiel la valoro de la krudmaterialo povas ŝanĝiĝi, tiel ankaŭ la valoro de la laborrimedoj jam servantaj en la produktadprocezo, de la maŝinaro ktp, do ankaŭ la valorparto kiun ili aldonas al la produkto. Se ekz-e, sekve al nova invento, ia maŝino produkteblas per malpli granda elspezo de laboro, tiam la samspeca malnova maŝino perdas pli aŭ malpli da sia valoro kaj do transdonas ankaŭ proporcie malpli da valoro al la produkto. Sed ankaŭ ĉi tie la valorŝanĝo fontas ekster la produktadprocezo en kiu la maŝino funkcias kiel produktadrimedo. En tiu procezo ĝi transdonas neniam pli da valoro ol ĝi posedas sendepende de tiu procezo.

Kiel ŝanĝo en la valoro de la produktadrimedoj, eĉ se retroefike post sia

37 „Ĉiuj samspecaj produktoj konsistigas envere nun unu amason, kies prezo estas determinata ĝenerale kaj sen konsidere la apartajn cirkonstancojn.” (Le Trosne, l.c., p. 893)

jam okazinta eniro en la procezon, ne ŝanĝas sian karakteron kiel konstanta kapitalo, tiel ankaŭ ŝanĝo en la proporcio inter konstanta kaj varia kapitalo ne tuŝas ties funkcian diferencon. Ekz-e la teĥnikaj kondiĉoj de la laborprocezo povas esti transformitaj tiel ke, kie antaŭe 10 laboristoj per 10 malmulte valoraj laboriloj prilaboris relative malgrandan kvanton da krudmaterialo, nun 1 laboristo per multekosta maŝino prilaboras la centoblan krudmaterialon. En tiu kazo la konstanta kapitalo, t.e. la valorkvanto de la aplikataj produktadrimedoj, estus ege kreskinta kaj la varia parto de la kapitalo, tiu antaŭpagita por laborforto, ege malkreskinta. Sed tiu ŝanĝo ŝanĝas nur la proporcion inter konstanta kaj varia kapitalo, alivorte la proporcion en kiu la ĉioma kapitalo dividiĝas en konstantaj kaj variaj partoj, sed ne tuŝas la diferencon de konstanta kaj varia kapitalo.

# *SEPA ĈAPITRO – La kvoto de la plusvaloro*

## 1. La ekspluatkvoto de la laborforto

La plusvaloro, kiun la antaŭpagita kapitalo K produktis en la produktadprocezo, aŭ la plivalorigo de la antaŭpagita kapitalvaloro K, prezentiĝas unue kiel kromaĵo de la valoro de la produkto super la valorsumo de ĝiaj produktadelementoj.

La kapitalo K dividiĝas en du partojn, monsumon k, elspezatan por produktadrimedoj, kaj alian monsumon v, elspezatan por laborforto; k prezentas la valorparton transformitan en konstantan, v tiun transformitan en varian kapitalon. Origine do K = k + v, ekz-e la antaŭpagita kapitalo de 500 sterlingaj pundoj = 410 sterlingaj pundoj + 90 st.pd. Ĉe la fino de la produktadprocezo elvenas varo kies valoro = k + v + p, kie p estas la plusvaloro, ekz-e 410 st.pd. + 90 st.pd. + 90 st.pd. La origina kapitalo K transformiĝis en K', el 500 st.pd en 590 st.pd. La diferenco inter ambaŭ estas = p, plusvaloro de 90. Ĉar la valoro de la produktadelementoj egalas la valoron de la antaŭpagita kapitalo, tial estas efektive taŭtologio diri, ke la kromaĵo de la produktvaloro super la valoro de siaj produktadelementoj egalas la plivalorigon de la antaŭpagita kapitalo aŭ egalas la produktitan plusvaloron.

Tamen tiu taŭtologio postulas iom pli detalan esploradon. La valoro komparata kun la produktvaloro estas la valoro de la produktelementoj konsumitaj en ĝia estiĝo. Sed ni vidis, ke la parto de la aplikita konstanta kapitalo kiu konsistas el laborrimedoj donas nur parton de sia valoro al la produkto, dum alia parto plu daŭras en sia malnova ekzistformo. Ĉar tiu lasta ne ludas rolon en la valorestigo, ni povas ĝin provizore neglekti. Enmeti ĝin en la kalkulon ŝanĝus nenion. Ni supozu ke k = 410 sterlingaj pundoj konsistas el krudmaterialo je 312 st.pd., helpmaterialoj je 44 st.pd. kaj la maŝinaro eluzita en la procezo je 54 st.pd., sed ke la valoro de la reale aplikita maŝinaro sumiĝas je 1.054 st.pd. Kiel antaŭpagitan valoron por produktado de la produktvaloro ni kalkulas nur la valoron de 54 st.pd., kiun la maŝinaro perdas per sia funkciado kaj do transdonas al la produkto. Se ni kunkalkulus la 1.000 st.pd., kiuj ekzistas en sia malnova formo kiel vapormaŝino ktp, tiam ni devus kunkalkuli ĝin ĉe ambaŭ flankoj, ĉe la flanko de la antaŭpagita kapitalo kaj ĉe la flanko de la produktvaloro,[38] kaj tiel ricevus respektive 1.500 st.pd. kaj 1.590 st.pd. La

38 „Se ni kalkulas la valoron de la aplikita fiksa kapitalo kiel parton de la antaŭpagita kapitalo, tiam ni devas fine de la jaro kalkuli la restantan valoron de tiu kapitalo kiel parton de la jarenspezoj.” (Malthus, „Pric. of Pol. Econ.”, dua eld., Londono, 1836, p. 269)

diferenco aŭ la plusvaloro estus tiam kiel antaŭe 90 st.pd. Ni komprenas do sub la konstanta kapitalo antaŭpagita por la valorproduktado, tie kie la malo ne kompreniĝas el la kunteksto, ĉiam nur la valoron de la produkt-adrimedoj konsumitaj en la produktado.

Kun tiu antaŭkondiĉo ni revenas al la formulo K = k + v, kiu transformiĝas en K' = k + v + p kaj ĝuste per tio transformas K en K'. Oni scias ke la valoro de la konstanta kapitalo en la produkto nur reaperas. La valorprodukto vere novkreita en la procezo estas do alia ol la produktvaloro ricevita el la procezo; ĝi ne estas, kiel oni unuavide povus supozi, k + v +p aŭ 410 st.pd + 90 st.pd. + 90 , sed v + p aŭ 90 st.pd + 90 st.pd, ne 590 st.pd, sed 180 st.pd. Se c, la konstanta kapitalo, = 0, alivorte, se ekzistus industribranĉoj en kiuj la kapitalisto ne bezonas apliki produktitajn produktadrimedojn, nek krudmaterialon nek helpmaterialojn, nek laborinstrumentojn, sed nur materialojn ekzistantajn en la naturo kaj laborforton, tiam ne transdoniĝus konstanta valorparto al la produkto. Tiu elemento de la produktvaloro, en nia ekzemplo 410 st.pd., forestus, sed la valorprodukto de 180 st.pd., kiu entenas 90 st.pd. da plusvaloro, restus tute same granda, kvazaŭ k prezentus la plej grandan valorsumon. Ni havus K = 0 + v = v, kaj K', la plivalorigita kapitalo, = v + p, do K' – K kiel antaŭe = p. Inverse, se p = 0, alivorte se la laborforto, kies valoro estas antaŭpagata en varia kapitalo, produktus nur sian ekvivalenton, tiam K = k + v, kaj K' (la produktvaloro) = k + v + 0, do K = K'. La antaŭpagita kapitalo ne estus plivaloriĝinta.

Fakte ni jam scias, ke la plusvaloro estas nur la sekvo de la valorŝanĝo kiu okazas ĉe v, la kapitalparto transformita en laborforton, do ke v + p = v + Dv (v plus kromaĵo de v). Sed la reala valorŝanĝo kaj la proporcio, en kiu tiu valoro v ŝanĝiĝas, estas vualitaj de la cirkonstanco ke pro kresko de ĝia varia parto ankaŭ la antaŭpagita ĉiomkapitalo kreskas. Ĝi estis 500, kaj ĝi fariĝas 590. La pura analizo de la procezo devas do tute abstrakti la parton de la produktvaloro, en kiu nur reaperas konstanta kapitalvaloro, do meti la konstantan kapitalon k = 0. Tio estas nur apliko de matematika regulo, uzata kiam oni kalkulas per konstantaj kaj variaj grandoj kaj kie la konstanta grando – rilatas al la varia nur per adicio aŭ subtraho.

Kroma malfacilaĵo fontas el la origina formo de la varia kapitalo. Tiel, en la supra ekzemplo, K' = 410 st.pd. da konstanta kapitalo + 90 st.pd. da varia kapitalo + 90 st.pd. da plusvaloro. Sed naŭdek st.pd. estas donita, do konstanta grando, kaj pro tio ŝajnas absurde trakti ĝin kiel varian grandon. Sed 90 st.pd., aŭ 90 st.pd. da varia kapitalo, estas ĉi tie fakte nur simbolo

por la procezo kiun tiu valoro trairas. La kapitalparto antaŭpagita ĉe la aĉeto de la laborforto estas certa kvanto da konkretigita laboro, do konstanta valorgrando, kiel la valoro de la aĉetita laborforto. Sed en la produktadprocezo mem la 90 st.pd. estas anstataŭataj de la aganta laborforto, morta laboro estas anstataŭata de viva laboro, stagna grando de flua, konstanta grando de varia. La rezulto estas la reproduktado de v plus kromaĵo de v. El la vidpunkto de la kapitalisma produktado la tuta ĉi okazaĵo estas moviĝo de la origine konstanta valoro transformita en laborforton. Al ĝi oni atribuas la procezon kaj ĝian rezulton. Se la formulo 90 st.pd. da variabla kapitalo aŭ plivaloriĝanta valoro ŝajnas do kontraŭdira, ĝi esprimas nur imanentan kontraŭdiron de la kapitalisma produktado.

Unuavide povas ŝajni strange samigi la konstantan kapitalon kun 0. Oni tamen faras tion konstante en la ĉiutaga vivo. Se iu volas kalkuli ekz-e la gajnon de Anglio en la kotonindustrio, li subtrahas antaŭ ĉio la kotonprezon pagitan al Usono, Hindio, Egiptio ktp; t.e. li metas en la produktvaloron nur reaperantan kapitalvaloron = 0.

Tamen ekonomie ege gravas ne nur la proporcio de la plusvaloro al la kapitalparto el kiu ĝi rekte fontas kaj kies valorŝanĝon ĝi prezentas, sed ankaŭ ĝia proporcio al la antaŭpagita tuta kapitalo. Ni pritraktos tiun proporcion do detale en la tria libro. Por plivalorigi parton de la kapitalo per ĝia transformado en laborforton, necesas ke alia parto de la kapitalo estu transformita en produktadrimedojn. Por ke la varia kapitalo funkciu, necesas ke konstanta kapitalo estu investita en ĝustaj proporcioj, laŭ la speciala karaktero de la laborprocezo. Sed la cirkonstanco ke oni bezonas por ĥemia procezo retortojn kaj aliajn vazojn, ne devigas la analizanton konsideri ilin en la rezulto de la analizo. Se ni rigardas la valorestigon kaj valorŝanĝon mem, do la puran fenomenon, tiam la produktadrimedoj, tiuj materialaj formoj de la konstanta kapitalo, liveras nur la materialon en kiu la flua, valorestiga forto devas fiksiĝi. La naturo de tiu materialo estas do tute indiferenta, ĉu kotono aŭ fero. Ankaŭ la valoro de tiu materialo estas indiferenta. Ĝi devas nur ĉeesti en sufiĉa kvanto por povi sorbi la laborkvanton elspezendan dum la produktadprocezo. Kun donita kvanto de tiu materialo, ĝia valoro povas kreski aŭ malkreski, aŭ ĝi povas esti senvalora, kiel tero kaj maro, la procezo de valorestigo kaj valorŝanĝo ne estas tuŝata de tio.[39]

39 *Noto al la 2-a eld.:* Estas memkompreneble, kiel diras Lukrecio *„nil posse creari de nihilo”*, el nenio fariĝas nenio. „Valorestigo” estas transformado de laborforto en laboron. La laborforto siavice estas antaŭ ĉio naturmaterialo transformita en homan organismon.

Ni metas do unue la konstantan kapitalparton egala al nulo. La antaŭpagita kapitalo reduktiĝas pro tio de k + v al v, kaj la produktvaloro k + v + p al la valorprodukto v + p. Ĉe donita valorprodukto = 180 st.pd., en kiu prezentiĝas la laboro kiu enfluas en ĝin dum la tuta daŭro de la produktadprocezo, ni devas subtrahi la valoron de la varia kapitalo = 90 st.pd por ricevi la plusvaloron = 90 st.pd. La nombro 90 st.pd. = p esprimas ĉi tie la absolutan grandon de la produktita plusvaloro. Sed ĝia proporcia grando, do la proporcio, en kiu la varia kapitalo plivaloriĝas, estas evidente determinata de la proporcio de la plusvaloro al la varia kapitalo, aŭ estas esprimata en $^{p}/_{v}$. En la supra ekzemplo do en $^{90}/_{90}$ = 100 %. Tiun proporcian plivalorigon de la varia kapitalo aŭ la proporcian grandon de la plusvaloro mi nomas la kvoto de la plusvaloro.[40]

Ni vidis, ke la laboristo dum unu parto de la laborprocezo produktas nur la valoron de sia laborforto, t.e. la valoron de siaj necesaj vivrimedoj. Ĉar li produktas en stato kiu baziĝas sur socia divido de la laboro, li produktas siajn vivrimedojn ne rekte, sed, en formo de aparata varo, ekz-e de fadeno, valoron kiu estas sama kiel la valoro de liaj vivrimedoj, aŭ kiel la mono per kiu li aĉetas ilin. La parto de lia labortago, kiun li konsumas por tio, estas pli granda aŭ pli malgranda, laŭ la valoro de liaj mezumaj ĉiutagaj vivrimedoj, do laŭ la mezuma ĉiutaga labortempo necesa por ilia produktado. Se la valoro de liaj ĉiutagaj vivrimedoj prezentas mezume 6 konkretigitajn laborhorojn, tiam la laboristo devas ĉiutage labori 6 horojn por produkti ĝin. Se li ne laborus por la kapitalisto, sed por si mem, sendepende, tiam li devus, ĉe aliaj senŝanĝaj cirkonstancoj, daŭre labori mezume la saman proporcian parton de la tago por produkti la valoron de sia laborforto kaj per tio gajni la vivrimedojn necesajn por lia propra konserviĝo aŭ por lia konstanta reproduktiĝo. Ĉar en la parto de la labortago, en kiu li produktas la tagvaloron de la laborforto, ekz-e 3 ŝilingojn, li produktas nur ekvivalenton por ĝia valoro jam pagita de la kapitalisto[41], do anstataŭas per la nove kreita valoro nur la antaŭpagitan varian kapitalvaloron, tiu produktado de valoro aperas kiel nura reproduktado. Do, la parton de la labortago, en kiu tiu reproduktado okazas, mi nomas necesa

40 En la sama maniero, kiel la anglo uzas „rate of profits”, „rate of interest” ktp. Oni vidos el la Libro III, ke la profitkvoto kompreneblas facile, ekde kiam oni konas la leĝojn de la plusvaloro. Per la inversa metodo oni komprenas ne la unuan, nek la alian.

41 *Noto al la 3-a eld.:* La aŭtoro uzas ĉi tie la kutiman ekonomian lingvon. Oni memoru, ke sur p. 137 <vidu en tiu ĉi volumo, p. 188> [en tiu ĉi Esperanta eldono: p. …] pruviĝis ke en la realo ne la kapitalisto al la laboristo, sed la laboristo „antaŭigas” al la kapitalisto. – F.E.

labortempo, la laboron elspezitan en la sama tempo, necesa laboro.[42] Necesa ĝi estas por la laboristo, ĉar ĝi estas sendependa de la socia formo de lia laboro. Necesa por la kapitalo kaj ties mondo ĝi estas, ĉar la konstanta ekzisto de la labristo estas ĝia bazo.

La dua periodo de la laborprocezo, dum kiu la laboristo agas trans la limoj de la necesa laboro, ja kostas al li laboron, elspezon de laborforto, sed ne estigas valoron por li. Ĝi estigas plusvaloron, kiu alridas sole la kapitaliston per la tuta logo de kreaĵo el nenio. Tiun parton de la labortago mi nomas kromlabortempo[43] kaj la laboron elspezitan en ĝi kromlaboro[44]. Same kiel gravas la ekkono de la valoro entute, kompreni ĝin kiel nuran koaguliĝon de labortempo, kiel nur konkretigita laboro, tiel gravas por la ekkono de la plusvaloro kompreni ĝin kiel nuran koaguliĝon de pluslabortempo, kiel nur konkretigitan plusvaloron. Nur la formo en kiu oni deprenas tiun plusvaloron de la rekta produktanto, la laboristo, distingas la ekonomiajn soci-ordojn, ekz-e la socion de sklavismo disde tiu de la dunglaboro.[45]

Ĉar la valoro de la varia kapitalo = valoro de la laborforto aĉetita de ĝi, ĉar la valoro de tiu laborforto determinas la necesan parton de la labortago, sed ĉar la plusvaloro siavice estas determinata de la kroma parto de la labortago, tial sekvas: La plusvaloro rilatas al la varia kapitalo, kiel la kromlaboro al la necesa laboro, aŭ la kvoto de la plusvaloro $^{p}/_{v} = {}^{(\text{kromlaboro})}/$

42 Ni uzis ĝis nun en tiu ĉi verko la vorton „necesa labortempo” por la entute socie necesan labortempon por produktado de varo. Ekde nun ni uzas ĝin ankaŭ por la labortempo necesa por la produktado de la specifa varo laborforto. La uzado de la samaj terminoj en diversa senco estas ĝena, sed en neniu scienco tute evitebla. Oni komparu ekz-e la altajn kaj malaltajn partojn de matematiko.

43 *En la originalo:* Surplusarbeitszeit. -vl

44 *En la originalo:* Mehrarbeit (surplus labour). La germana esprimo signifas *pluslaboro, kromlaboro,* ĉi tie uzataj sinonime. -vl

45 S-ro Wilhelm Thukydides Roscher malkovras per genieco simila al tiu de Gottsched, ke, se la estiĝo de plusvaloro aŭ plusprodukto, kaj la akumulado ligita al tiu, estas nuntempe ŝuldata al la „ŝparemo” de la kapitalisto, kiu por tio „ekz-e postulas interezon”, male „sur la plej malaltaj kulturŝtupoj … la pli malfortaj estas devigataj de la pli fortaj al ŝparemo”. (l.c., p. 82, 78) Ĉu por ŝparado de laboro? aŭ por ne ekzistantaj kromaj produktoj? Apud reala nescio estas apologia timemo antaŭ skrupula analizo de la valoro kaj de la plusvaloro, kaj antaŭ rezulto eventuale kontraŭpolica, kiu devigas iujn Roscher kaj samspeculojn tordi la pli aŭ malpli kredindajn pravigojn de la kapitalisto por lia alproprigo de ekzistantaj plusvaloroj en estiĝkialojn de la plusvaloro.

$_{\text{(necesa laboro)}}$. Ambaŭ proporcioj esprimas la saman rilaton en diversaj formoj, jen en la formo de konkretigita, jen en la formo de flua laboro.

La kvoto de la plusvaloro estas do la preciza esprimo por la grado de ekspluatado de la laborforto fare de la kapitalo aŭ de la laboristo fare de la kapitalisto.[46]

Laŭ nia supozo, la kvoto de la plusvaloro estis la valoro de la produkto = 410 st.pd + 90 st.pd + 90 st.pd, la antaŭpagita kapitalo = 500. Ĉar la plusvaloro = 90 kaj la antaŭpagita kapitalo = 500, oni ricevus laŭ la kutima kalkulmaniero, ke la kvoto de la plusvaloro (kiun oni konfuzas kun la profitkvoto) = 18 %, proporcia nombro kies malalteco emus kortuŝi s-rojn Carey kaj aliajn harmoniulojn. Sed fakte la kvoto de la plusvaloro ne estas = $^{p}/_{K}$ aŭ $^{p}/_{k + p}$, sed = $^{p}/_{v}$, do ne 90/500, sed 90/90 = 100 %, pli ol la kvinoblo de la ŝajna grado de ekspluatado. Kvankam ni en la donita kazo ne konas la absolutan grandon de la labortago, ankaŭ ne la periodon de la laborprocezo (tagon, semajnon ktp), fine ankaŭ ne la nombron da laboristoj kiuj samtempe movas la varian kapitalon de po 90 st.pd., la kvoto de la plusvaloro $^{p}/_{v}$ montras al ni, per ĝia konverteblo en $^{\text{(kromlaboro)}}/_{\text{(necesa laboro)}}$ precize la proporcion de la du konsistigaj partoj de la labortago unu al la alia. Ĝi estas 100 %. Do la laboristo laboris unu duonon de la tago por si kaj la alian duonon por la kapitalisto.

La metodo de kalkulado de la kvoto de plusvaloro estas do koncize tiu: Ni prenas la tutan produktvaloron kaj metas la en ĝi reaperantan konstantan kapitalvaloron egala al nulo. La restanta valorsumo estas la sole en la estigprocezo de la varo reale produktita valorprodukto. Se la plusvaloro estas donita, tiam ni subtrahas ĝin de tiu valorprodukto, por trovi la varian kapitalon. Inverse, se tiu lasta estas donita kaj se ni serĉas la plusvaloron. Se ambaŭ estas donitaj, tiam farendas jam nur la fina operacio, kalkuli la proporcion de la plusvaloro al la varia kapitalo, $^{p}/_{v}$.

Kvankam la metodo estas simpla, tamen ŝajnas konvene enkonduki la leganton per kelkaj ekzercoj en la aplikadon de la principoj sur kiuj ĝi baziĝas kaj kiuj estas novaj al li.

46 Noto al la 2-a eld.: Kvankam preciza esprimo por la ekspluatgrado de la laborforto, la kvoto de la plusvaloro ne estas esprimo por la *absoluta* grando de la ekspluatado. Ekz-e, se la necesa laboro = 5 horoj kaj la pluslaboro = 5 horoj, tiam la ekspluatgrado = 100 %. La grando de la ekspluatado estas ĉi tie mezurita je 5 horoj. Sed se la necesa laboro = 6 horoj kaj la pluslaboro = 6 horoj, tiam la ekspluatgrado de 100 % restas senŝanĝa, dum la grando de la ekspluatado kreskas je 20 %, de 5 al 6 horoj.

Unue la ekzemplon de ŝpinejo de 10.000 ŝpiniloj, kiuj ŝpinas fadenon n-ro 32 el usona kotono kaj el kiuj ĉiu ŝpinilo produktas ĉiusemajne po 1 funton da fadeno. La defalaĵo estas 6 %. Do, 10.600 funtoj da kotono estas ĉiusemajne transformataj en 10.000 funtojn da fadeno kaj 600 funtojn da defalaĵo. En aprilo 1871 tiu kotono kostis po $7^{3}/_{4}$ d. je funto, do por 10.600 funtoj proksimume 342 st.pd. La 10.000 ŝpiniloj, inkluzive de antaŭŝpina maŝinaro kaj vapormaŝino, kostas po 1 st.pd por ĉiu ŝpinilo, do 10.000 st.pd. Ilia eluziĝo estas 10 % = 1.000 st.pd. aŭ ĉiusemajne 20 st.pd. La lupago por la fabrikkonstruaĵo estas 300 st.pd. aŭ 6 st.pd. ĉiusemajne. Karbo (po 4 funtoj por horo kaj ĉevalforto, je 100 ĉevalforto [indikilo] kaj 60 horoj semajne inkluzive de hejtado de la konstruaĵo) 11 tunoj semajne, je po 8 ŝ. 6 d. por ĉiu tuno, kostas proksimume $4^{1}/_{2}$ st.pd. semajne; gaso je 1 st.pd. semajne, oleo $4^{1}/_{2}$ st.pd. semajne, do ĉiuj helpmaterialoj 10 st.pd. semajne. Do, la konstanta valorparto estas 378 st.pd. por la semajno. La salajro estas 52 st.pd. por la semajno. La fadenprezo estas po $12^{1}/_{4}$ d. por la funto aŭ 10.000 funtoj = 510 st.pd., la plusvaloro do 510 - 430 = 80 st.pd. Ni metas la konstantan valorparton de 378 st.pd. = 0, ĉar ĝi ne kunludas en la ĉiusemajna valorestigo. Restas la semajna valorprodukto de 132 = 52 + 80 st.pd. La kvoto de la plusvaloro do = $^{80}/_{52}$ = $153^{11}/_{13}$ %. Ĉe dekhora mezuma labortago tio donas: Necesa laboro = $3^{31}/_{33}$ horoj kaj kromlaboro = $6^{2}/_{33}$ horoj.[47]

Jacob donas, en libro pri la grenleĝoj por la jaro 1815, ĉe supozo de tritikprezo de 80 ŝ. por ĉiu kvarto kaj de mezuma rikolto de 22 buŝeloj[48] por ĉiu akreo[49], tiel ke la akreo enspezigas 11 sterlingajn pundojn, sekvan kalkulon, kiu estas tre mankhava pro antaŭa kompensado de diversaj sumoj, sed por nia celo sufiĉe taŭga.

## Valorprodukto po akreo

47 *Noto al la 2-a eldo.:* La ekzemplo donita en la unua eldono, de ŝpinejo por la jaro 1860 entenis kelkajn faktajn erarojn. La precizaj datumoj donitaj en la supra teksto estis liveritaj al mi de manĉestra fabrikisto. – Notindas ke en Anglio la malnova ĉevalforto estis kalkulita laŭ la diametro de la cilindro, la nova laŭ la reala forto kiun montras la indikilo.

48 Buŝelo: mezurunuo, brita buŝelo: 36,5 litroj, usona buŝelo 35,2 litroj. (Laŭ Peter Benson: Comprehensive English-Esperanto Dictionary, Esperanto League for North America, El Cerrito, 1995) -vl

49 Akreo: 1 akreo (angle: acre): 0,405 hektaro (laŭ Peter Benson, saml.)

| | | | |
|---|---|---|---|
| semoj (tritiko) | 1 st.pd. 9 ŝ. | dekonaĵoj, impostoj | |
| sterkaĵo | 2 st.pd. 10 ŝ. | grundrento | 1 st.pd. 8 ŝ. |
| salajro | 3 st.pd. 10 ŝ. | profito k. interezoj de farmisto | 1 st.pd. 2 ŝ. |
| | | **sumo:** | **3 st.pd. 11 ŝ.** |
| **sumo:** | **7 st.pd. 9 ŝ.** | 1 st.pd. 1 ŝ. | |

La plusvaloro, ĉiam sub la kondiĉo ke la prezo de la produkto = ĝia valoro, estas ĉi tie disigita en la diversaj rubrikoj profito, interezo, dekonaĵo ktp. Tiuj rubrikoj tute ne interesas nin. Ni sumigas ilin kaj ricevas plusvaloron de 3 sterlingaj pundoj 11 ŝilingoj. La sumon de 3 st.pd. 19 ŝ. por semoj kaj sterkaĵoj ni egaligas al nulo kiel konstantan kapitalon. Restas la varia kapitalo antaŭpagita de 3 st.pd. 10 ŝ., anstataŭ kiu estas produktita nova valoro de 3 st.pd. 10 ŝ. + 3 st.pd. 11 ŝ. Do, $^{p}/_{v} = {}^{(3\text{ st.pd. }11\text{ ŝ.})}/_{(3\text{ st.pd. }10\text{ ŝ.})}$, pli ol 100 %. La laboristo aplikas pli ol la duonon de sia labortago al la produktado de plusvaloro, kiun diversaj personoj sub diversaj pretekstoj dividas inter si.[50]

## 2. Esprimo de la produktvaloro en proporciaj partoj de la sama produkto

Ni revenu nun al la ekzemplo kiu montris al ni kiel la kapitalisto faras el mono kapitalon. La necesa laboro de lia ŝpinisto estis 6 horoj, la kromlaboro same, la ekspluadkvoto de la laborforto do 100 %.

La produkto de la dekduhora labortago estas 20 funtoj da fadeno je valoro de 30 ŝ. Ne malpli ol $^{8}/_{10}$ de tiu fadenvaloro (24 ŝ.) estas la nur reaperanta valoro de la konsumitaj produktadrimedoj (20 st.pd. da kotono je 20 ŝ., ŝpiniloj ktp je po 4 ŝ.) alivorte konsistas el konstanta materialo. La ceteraj $^{2}/_{10}$ estas la novvaloro de 6 ŝ. estiĝinta dum la ŝpinado, el kiu la duono anstataŭas la antaŭpagitan tagvaloron de la laborforto, alivorte la

50 La donitaj kalkuloj validas nur kiel ilustraĵo. Estas ja supozate ke prezoj = valoroj. Oni vidos en Libro III, ke tiu egaligo, eĉ por la mezumaj prezoj, ne fareblas en tiu simpla maniero.

varian kapitalon, kaj la alia duono estas plusvaloro de 3 ŝ. La suma valoro de la 20 funtoj da fadeno konsistas do jene:

Fadenvaloro de 30 ŝ. = 24 ŝ. + 3 ŝ. + 3 ŝ.

Ĉar tiu suma valoro prezentiĝas en la suma produkto de 20 funtoj da fadeno, ankaŭ la diversaj valorelementoj devas esti prezenteblaj en proporciaj partoj de la produkto.

Se ekzistas fadenvaloro de 30 ŝ. en 20 funtoj da fadeno, tiam $^{8}/_{10}$ de tiu valoro, alivorte ĝia konstanta parto de 24 ŝ ekzistas en $^{8}/_{10}$ de la produkto, aŭ en 16 funtoj da fadeno. El tio $13^{1}/_{3}$ funtoj prezentas la valoron de la krudmaterialo, de la ŝpinita kotono je 20 ŝ. kaj $2^{2}/_{3}$ funtoj la valoron de la konsumitaj helpmaterialoj kaj laborrimedoj, ŝpiniloj ktp. je 4 ŝ.

$13^{1}/_{3}$ funtoj da fadeno prezentas do la tutan kotonon ŝpinitan al la suma produkto de 20 funtoj da fadeno, la krudmaterialon de la suma produkto, sed nenion pli. En ili kuŝas ja nur $13^{1}/_{3}$ funtoj da kotono en valoro de $13^{1}/_{3}$ ŝ., sed ĝia kroma valoro de $6^{2}/_{3}$ ŝ. estas ekvivalento por la kotono ŝpinita al la aliaj $6^{2}/_{3}$ funtoj da fadeno. Estas kvazaŭ la tuta kotono de la tuta produkto estus enpremita en $13^{1}/_{3}$ funtoj da fadeno kaj ke jam ne troviĝus eĉ ero da ĝi en la restantaj $6^{2}/_{3}$ funtoj. Sed ili entenas nun eĉ ne atomon de la valoro de la konsumitaj helpmaterialoj kaj laborrimedoj nek de la novvaloro kreita en la ŝpinprocezo.

Same kromaj $^{22}/_{3}$ st.pd. da fadeno, en kiu kuŝas la resto de la konstanta kapitalo (= 4 ŝ.), prezentas nenion alian ol la valoron de la helpmaterialoj kaj laborrimedoj konsumitaj en la suma produkto de 20 funtoj da fadeno.

Ok dekonoj de la produkto, aŭ 16 funtoj da fadeno, kvankam, se oni rigardas ilin korpe, kiel uzvaloron, kiel fadenon, ili estas same faritaĵoj el ŝpinlaboro kiel la restantaj produktpartoj, entenas do en tiu kunteksto nenian ŝpinlaboron, nenian laboron ensuĉitan dum la ŝpinprocezo mem. Estas kvazaŭ ili transformiĝintus sen ŝpinado en fadenon kaj kvazaŭ ilia fadenformo estus nur trompo. Efektive, se la kapitalisto vendas ilin je 24 ŝ. kaj per tio reaĉetas siajn produktadrimedojn, tiam montriĝas ke 16 funtoj da fadeno – estas nur maskitaj kotono, ŝpiniloj, karbo ktp.

Inverse, la restantaj $^{2}/_{10}$ de la produkto, aŭ 4 funtoj da fadeno, reprezentas nun nenion alian ol la novvaloron de 6 ŝ. produktitan en la dekduhora ŝpinado. La tuta valoro de la konsumitaj krudmaterialoj kaj laborrimedoj, kiu troviĝis en ili, estis forprenita de ili kaj enkorpigita al la unuaj 16 funtoj da fadeno. La ŝpinlaboro enkorpiĝinta en 20 funtoj da fadeno estas koncentrita en $^{2}/_{10}$ de la produkto. Estas kvazaŭ la ŝpinisto

estus ŝpininta 4 funtojn da fadeno en la aero aŭ per kotono kaj ŝpiniloj ekzistantaj sed sen aldono de homa laboro kaj kiuj do ne aldonas valoron al la produkto.

El la 4 funtoj da fadeno, en kiu la tuta valorprodukto de la ĉiutaga ŝpinado ekzistas, unu duono reprezentas nur la anstataŭan valoron de la konsumita laborforto, do la varian kapitalon de 3 ŝ., la aliaj 2 funtoj da fadeno nur la plusvaloron de 3 ŝ.

Ĉar 12 laborhoroj de la ŝpinisto konkretiĝas en 6 ŝ., 60 laborhoroj estas konkretiĝintaj en la fadenvaloro de 30 ŝ. Ili ekzistas en 20 funtoj da fadeno, el kiuj $^{8}/_{10}$ aŭ 16 funtoj estas la materiiĝo de 48 laborhoroj okazintaj antaŭ la ŝpinprocezo, nome la laboro konkretigita en la produktadrimedoj de la fadeno, aliflanke $^{2}/_{10}$ aŭ 4 funtoj la materiiĝo de la 12 laborhoroj elspezitaj en la ŝpinprocezo.

Antaŭe ni vidis, ke la fadenvaloro egalas la sumon de la novvaloro produktita en ĝia produktado plus la valoroj ekzistantaj jam antaŭe en ĝiaj produktadrimedoj. Nun montriĝis, kiel la funkcie aŭ nocie diversaj konsistigaj partoj prezenteblas en proporciaj partoj de la produkto mem.

Tiu disigo de la produkto – de la rezulto de la produktadprocezo – en kvanton de produkto, kiu reprezentas nur la laboron entenatan en la produktadrimedoj aŭ la konstantan kapitalparton, en alian kvanton kiu reprezentas nur la necesan laboron aldonitan en la produktadprocezo aŭ la varian kapitalparton, kaj lastan kvanton de produkto, kiu reprezentas nur la kromlaboron aldonitan en la sama procezo aŭ la plusvaloron, tiu disigo estas same simpla kiel grava, kiel montros ĝia posta apliko al komplikaj kaj ĝis nun ne solvitaj problemoj.

Ni rigardis ĵus la suman produkton kiel pretan rezulton de la dekduhora labortago. Sed ni povas ankaŭ akompani ĝin en ĝia estiĝprocezo kaj tamen prezenti la partajn produktojn kiel funkcie diversajn produktpartojn.

La ŝpinisto produktas en 12 horoj 20 funtojn da fadeno, pro tio en unu horo $1^{2}/_{3}$ kaj en 8 horoj $13^{1}/_{3}$ funtojn, do partan produkton kiu sole jam valoras la tutan kotonon ŝpinitan dum la tuta labortago. En la sama maniero la parta produkto de la sekva horo kaj 36 minutoj = $2^{2}/_{3}$ funtoj da fadeno kaj do reprezentas la valoron de la laborrimedoj konsumitaj dum la 12 laborhoroj. Same, la ŝpinisto produktas en la sekva horo kaj 12 minutoj 2 funtojn da fadeno = 3 ŝ., produktvaloron egalan al la tuta valorprodukto kiun li kreas en 6 horoj da necesa laboro. Fine li produktas

en la lastaj $^{6}/_{5}$ horoj ankaŭ 2 funtojn da fadeno, kies valoro egalas al la plusvaloro kreita per lia duontaga kromlaboro. La angla fabrikisto aplikas tiun kalkulmanieron por sia propra ĉiutaga uzo, kaj li diras ekz-e ke en la unuaj 8 horoj, aŭ $^{2}/_{3}$ de la labortago, li rericevas la valoron de sia kotono; kaj tiel plu por la restantaj horoj. Kiel oni vidas, la metodo estas ĝusta; ĝi estas fakte la unua formulo transportita el la spaco en la tempon; el la spaco kie la partoj de la produktoj troviĝas tute pretaj kaj unu apud la alia, en la tempon kie ili sekvas unu la alian. Sed tiu formulo povas samtempe esti akompanata de tre barbaraj ideoj, nome en la kapoj kiuj havas saman intereson pri la praktika plivaloriga procezo kiel ili havas intereson miskompreni ĝin teorie. Tiel oni povas imagi, ke ekz-e nia ŝpinisto en la unuaj 8 horoj de sia labortago produktas aŭ anstataŭigas la valoron de la kotono, en la sekva horo kaj 36 minutoj la valoron de la konsumitaj laborrimedoj, en la sekva horo kaj 36 minutoj la valoron de la konsumitaj laborrimedoj, en la sekva horo kaj 12 minutoj la valoron de sia salajro, kaj nur la famegan „lastan horon” li dediĉas al la fabrikestro, al la produktado de plusvaloro. La ŝpiniston oni ŝarĝas per la duobla miraklo produkti kotonon, ŝpinilojn, vapormaŝinon, karbon, oleon ktp en la sama momento en kiu li ŝpinas per ili, kaj fari el unu labortago de donita grado de intenso kvin tiajn tagojn. En nia kazo la produktado de la krudmaterialoj kaj de la laborrimedoj necesas $^{24}/_{6}$ = 4 dekduhorajn labortagojn kaj ilia transformado en fadenon kroman dekduhoran labortagon. Ke la avido kredas tiajn miraklojn kaj neniam mezuras la doktrineman jes-ulaĉon kiu pruvas ilin, tion montru nun historie fama ekzemplo.

## 3. La „lasta horo” de Senior

Je bela mateno de la jaro 1836, Nassau W. Senior, fama pro sia ekonomia scienco kaj sia bela stilo, iel la Clauren inter la anglaj ekonomikistoj, estis invitita de Oksfordo al Manĉestro, por tie lerni politikan ekonomion, anstataŭ instrui ĝin en Oksfordo. La fabrikistoj elektis lin sia defendanto kontraŭ la ĵus promulgita fabrikleĝo[51] kaj kontraŭ la agitado por la dekhora labortago, kiu iris eĉ pli antaŭen. Kun sia kutima sagaco ili ekkonis, ke la s-ro profesoro „bezonis ankoraŭ bonan poluradon”[52] Ili do venigis lin al Manĉestro. La s-ro profesoro siavice metis la ricevitan lecionon en elegantan stilon en la pamfleto: „Letters on the Factory Act, as it affects the cotton manufacture”, Londono, 1837. Tie legeblas i.a. jena edifaĵo:

51 *En la originalo angle:* Factory Act. -vl

52 *En la originalo angle:* „wanted a good deal of finishing”. -vl

> „Sub la nuna leĝo, neniu fabriko kiu dungas personojn sub 18 jaroj povas labori pli longe ol $11^{1}/_{2}$ horojn, t.e. 12 horojn dum la unuaj 5 tagoj kaj 9 horojn sabate. La sekva analizo (!) montras nun, ke en tia fabriko la tuta neta gajno devenas de la lasta horo. Fabrikisto elspezas 100.000 sterlingajn pundojn – 80.000 st.pd. en fabrikkonstruaĵoj kaj maŝinoj, 20.000 en krudmaterialoj kaj salajro. La jara spezo de la fabriko, kondiĉe ke la kapitalo cirkulas unu fojon jare kaj ke la malneta gajno estas 15 %, devas esti de varoj en valoro de 115.000 st.pd. … El tiuj 115.000 st.pd. ĉiu el la 23 duonaj laborhoroj produktas ĉiutage $^{5}/_{115}$ aŭ $^{1}/_{23}$. El tiuj $^{23}/_{23}$, kiuj konsistigas la tuton de la 115.000 st.pd. (constituting the whole 115.000 st.pd.), $^{20}/_{23}$ anstataŭas, t.e. 100.000 el la 115.000, nur la kapitalon; $^{1}/_{23}$ aŭ 5.000 st.pd. el la 15.000 da malneta gajno (!) anstataŭas la eluziĝon de la fabriko kaj maŝinaro. La restantaj $^{2}/_{23}$, t.e. la du lastaj duonaj horoj de ĉiu tago produktas la netan gajnon de 10 %. Se do ĉe senŝanĝaj prezoj la fabriko rajtus labori 13 horojn anstataŭ $11^{1}/_{2}$, tiam, kun aldono de proksimume 2.6000 st.pd. al la cirkulanta kapitalo, la neta gajno pli ol duobliĝus. Aliflanke, se la laborhoroj estus reduktitaj je ĉiutage 1 horo, tiam la neta gajno malaperus, se je $1^{1}/_{2}$ horoj, tiam ankaŭ la malneta gajno."[53]

Jen kion la s-ro profesoro nomas „analizo"! Se li kredis la lamentadon

53 Senior, l.c., p. 12, 13. Ni ne pritraktos la kuriozaĵojn indiferentajn por nia celo, ekz-e la aserton, ke la fabrikistoj kalkulas la anstataŭadon de eluzita maŝinaro ktp, do de kapitalparto, al la gajno, ĉu neta aŭ malneta. Ankaŭ ne la ĝustecon aŭ malĝustecon de la nombroj. Ke ili ne valoras pli ol la tiel nomata „analizo", tion pruvis Leonard Horner en „A Letter to Mr. Senior etc", Londono, 1837. Leonard Horner, unu el la komisaroj pri esplorado de la fabrikkondiĉoj de 1833 kaj fabrikinspektisto, fakte fabrikcenzuristo, ĝis 1859, akiris eternajn meritojn por la angla laborista klaso. Krom kontraŭ la furiozaj fabrikestroj li faris vivolongan batalon kontraŭ la ministroj por kiuj estis senkompare pli grave nombri la „voĉojn" de la fabrikestroj en la malsupra ĉambro de la parlamento ol la laborhorojn de la „manoj" en la fabriko.

La prezentado de Senior estas konfuza, tute sendepende de ĝia enhava malĝusteco. Kion li envere volis diri, estas la jeno: La fabrikisto laborigas la laboristojn ĉiutage dum $11^{1}/_{2}$ aŭ $^{23}/_{2}$ horoj. Kiel la unuopa labortago, tiel ankaŭ la jara laboro konsistas el $11^{1}/_{2}$ aŭ $^{23}/_{2}$ horoj (obligite per la nombro da labortagoj dum la jaro). Laŭ tiu supozo, la $^{23}/_{2}$ laborhoroj produktas la jaran produkton de 115.000 st.pd.; $^{1}/_{2}$ laborhoro produktas $^{1}/_{23}$ x 115.000 st.pd.; $^{20}/_{2}$ laborhoroj produktas $^{20}/_{23}$ x 115.000 st.pd. = 100.000 st.pd., t.e. ili anstataŭas nur la antaŭpagitan kapitalon. Restas $^{3}/_{2}$ laborhoroj, kiuj produktas $^{3}/_{23}$ x 115.000 st.pd. = 15.000 st.pd., t.e. la malnetan gajnon. El tiuj $^{3}/_{2}$ laborhoroj $^{1}/_{2}$ laborhoro produktas $^{1}/_{23}$ x 115.000 st.pd., t.e. ĝi produktas nur la anstataŭon por la eluziĝo de la fabriko kaj de la maŝinaro. La lastaj du duonaj laborhoroj, t.e. la lasta laborhoro, produktas $^{2}/_{23}$ x 115.000 st.pd. = 10.000 st.pd., t.e. la netan profiton. En la teksto Senior transformas la lastajn $^{2}/_{23}$ de la produkto en partojn de la labortago mem.

de la fabrikistoj, ke la laboristoj malŝparas la plej bonan tempon de la tago en la produktado, do de la reproduktado aŭ anstataŭado de la valoro de konstruaĵoj, maŝinoj, kotono, karbo ktp, tiam ĉia analizo estis superflua. Li devis simple respondi: Sinjoroj! Se vi laborigas dum 10 horoj anstataŭ dum $11^{1}/_{2}$, tiam, sub alie senŝanĝaj kondiĉoj, la ĉiutaga konsumado de kotono, maŝinaro ktp malpliiĝos je $1^{1}/_{2}$ horoj. Vi gajnas ĝuste tiom kiom vi perdas. Viaj laboristoj malŝparos estonte $1^{1}/_{2}$ horojn malpli por la reproduktado aŭ anstataŭado de la antaŭpagita kapitalvaloro. Se li ne kredis ilin laŭvorte, sed opiniis analizon necesa, tiam li devis antaŭ ĉio, en demando kiu temas ekskluzive pri la proporcio de la neta gajno al la grando de la labortago, peti la sinjorojn fabrikistoj ne pelmele kunmiksi maŝinaron kaj fabrikkonstruaĵojn, krudmaterialon kaj laboron, sed bonvole meti la konstantan kapitalon entenatan en fabrikkonstruaĵoj, maŝinaro, krudmaterialoj ktp sur unu flankon, la kapitalon antaŭpagitan en salajro sur la alian flankon. Se tiam rezultiĝis ekzemple, ke laŭ la kalkulo de la fabrikistoj la laboristo en $^{2}/_{2}$ laborhoroj, aŭ en unu horo, reproduktas aŭ anstataŭigas la salajron, tiam la analizisto devis daŭrigi:

> Laŭ via indiko la laboristo produktas en la antaŭlasta horo sian salajron kaj en la lastan vian plusvaloron aŭ la netan gajnon. Ĉar li en la samaj tempospacoj produktas samajn valorojn, la produkto de la antaŭlasta horo havas la saman valoron kiel tiu de la lasta. Li produktas krome valoron entute nur dum li elspezas laboron, kaj la kvanto de lia laboro estas mezurata per lia labortempo. Tiu estas laŭ via indiko $11^{1}/_{2}$ horoj tage. Parton de tiuj $11^{1}/_{2}$ horoj li konsumas por produktado aŭ anstataŭado de sia salajro, la alian por produktado de via neta gajno. Ion kroman li ne faras dum la labortago. Sed ĉar, laŭ indiko, lia salajro kaj la plusvaloro liverata de li estas same grandaj valoroj, li produktas evidente sian salajron en $5^{3}/_{4}$ horoj kaj vian netan gajnon en kromaj $5^{3}/_{4}$ horoj. Ĉar krome la valoro de la duhora fadenprodukto egalas la valorsumon de lia salajro plus via neta gajno, tiu fadenvaloro devas esti mezurata per $11^{1}/_{2}$ laborhoroj, la produkto de la antaŭlasta horo per $5^{3}/_{4}$ laborhoroj, tiu de la lasta same. Ni venas nun al tikla punkto. Do atentu! La antaŭlasta laborhoro estas ordinara laborhoro kiel la unua. Nek pli nek malpli.[54] Kiel la ŝpinisto povas do produkti en unu laborhoro fadenvaloron kiu reprezentas $5^{3}/_{4}$ laborhorojn? Li efektive ne faras tian miraklon. Tio, kion li produktas en unu horo en formo de uzvaloro, estas certa kvanto da fadeno. La valoro de tiu fadeno estas mezurata per $5^{3}/_{4}$ laborhoroj, el kiuj $4^{3}/_{4}$ kuŝas sen lia interveno en la ĉiuhore konsumataj produktadrimedoj, en kotono, maŝinaro ktp, $^{4}/_{4}$ aŭ unu horo estas aldonata de li mem. Ĉar do lia salajro produktiĝas en $5^{3}/_{4}$ horoj kaj la fadenprodukto de unu ŝpinhoro entenas ankaŭ $5^{3}/_{4}$ laborhorojn, estas tute ne pro sorĉado ke la valorprodukto de liaj $5^{3}/_{4}$ ŝpinhoroj egalas al la produktvaloro de unu ŝpinhoro. Sed vi ja eraras se vi kredas ke li perdas unu solan sekundon de

54 *En la originalo franclingve:* Ni plus, ni moins. -vl

sia labortago per la reproduktado aŭ „anstataŭado” de la valoroj de kotono, maŝinaro ktp. Per tio, ke lia laboro faras el kotono kaj ŝpinilo fadenon, per tio ke li ŝpinas, la valoro de kotono kaj ŝpinilo transiras mem en la fadenon. Tio okazas pro la kvalito de lia laboro, ne pro ĝia kvanto. Tamen li en unu horo transigas pli da kotonvaloro ktp sur fadenon ol en $\frac{1}{2}$ horo, sed nur ĉar li ŝpinas en 1 horo pli da kotono ol en $\frac{1}{2}$ horo. Do vi komprenas: Via esprimo, ke la laboristo produktas en la antaŭlasta horo la valoron de sia salajro kaj en la lasta la netan gajnon, signifas nenion alian ol ke en la fadenprodukto de du horoj de lia labortago, egale ĉu ili troviĝas antaŭe aŭ malantaŭe, enkorpiĝis $11\frac{1}{2}$ laborhoroj, ĝuste tiom da horoj kiom havas lia tuta labortago. Kaj la esprimo, ke li produktas en la unuaj $5\frac{3}{4}$ horoj sian salajron kaj en la lastaj $5\frac{3}{4}$ horoj vian netan gajnon, signifas ankaŭ nenion ol ke vi pagas la unuajn $5\frac{3}{4}$ horojn kaj ne pagas la lastajn $5\frac{3}{4}$ horojn. Mi parolas pri pago de la laboro, anstataŭ de la laborforto, por paroli vian slangon. Se vi sinjoroj nun komparas la proporcion de la labortempo, kiun vi pagas, kun la labortempo, kiun vi ne pagas, tiam vi trovos, ke ĝi estas duona tago per duona tago, do 100 %, kio ja estas bela elcentaĵo. Estas ankaŭ nenia dubo ke, se vi eluzas viajn „manojn” anstataŭ dum $11\frac{1}{2}$ horoj 13 horojn kaj se vi – kio estas ĝuste via maniero – aldonas la kromajn $1\frac{1}{2}$ horojn nur al la plusvaloro, tiu do kreskos de $5\frac{3}{4}$ horoj al $7\frac{1}{4}$ horoj, la kvoto de la plusvaloro do de 100 % al $126\frac{2}{23}$ %. Sed vi vere troigus se vi esperus ke per tiu aldono de $1\frac{1}{2}$ horoj la kvoto de plusvaloro kreskus de 100 al 200 % kaj eĉ al pli ol 200 %, do ke ĝi „pli ol duobliĝos”. Aliflanke – la koro de la homo estas mirigaĵo, ĉefe se la homo portas sian koron en la monujo – vi estas vere tro frenezaj pesimistoj se vi timas ke per reduktado de la labortago de $11\frac{1}{2}$ al $10\frac{1}{2}$ horoj via tuta neta gajno frakasiĝus. Tute ne. Se ĉiuj aliaj kondiĉoj restas senŝanĝaj, la kromlaboro de $5\frac{3}{4}$ horoj falos al $4\frac{3}{4}$ horoj, kio daŭre estas tute konsiderinda kvoto de plusvaloro, nome $82\frac{14}{23}$ %. La fatala „lasta horo” tamen, pri kiu vi fantaziis pli ol la miljaruloj pri la mondperea lasta horo, estas pura blago[55]. Ĝia perdo kostos al vi nek la „netan gajnon” nek al la geinfanoj kiujn vi produktive konsumas, la „animpurecon”.[56]

55 *En la originalo angle:* „all bosh”. -vl

56 Se Senior pruvis, ke de „la lasta laborhoro” dependas la neta gajno de la fabrikistoj, la ekzistado de la angla kotonindustrio, la grandeco de Anglio sur la mondmerkato, aliflanke D-ro Andrew Ure pruvis, ke fabrikinfanoj kaj junuloj sub 18 jaroj, kiujn oni ne tenas plenajn 12 horojn en la varma kaj pura moralaero de la fabriksalono, sed elĵetas „unu horon” pli frue en la senkoran kaj frivolan eksteran mondon, estas viktimoj de nenifarado kaj malvirto kiuj neniigas ilian esperon je animsavo. Ekde 1848 la fabrikinspektistoj ne laciĝas en siaj duonjaraj raportoj primoki la fabrikistojn per „la lasta”, la „fatala horo”. Tiel s-ro Howell diras en sia fabrikraporto de la 31-a de majo 1855: „Se la sekva sagaca kalkulo (li citas Senior-on) estus ĝusta, tiam ĉiu kotonfabriko en la Unuiĝinta Reĝlando ekde 1850 estus laborinta kun perdo.” (Reports of the Insp. of Fact. for the half year ending 30th April 1855”, p. 19,

> Kiam via „lasta horo” iam reale sonas, pensu pri la profesoro de Oksfordo. Kaj nun: Nur en pli bona mondo, sinjoroj, mi deziras plu renkonti vin. Adiaŭ![57] …

Senior faris la malkovron de sia „lasta horo” en la jaro 1836. Ok jarojn poste, la 15-an de aprilo 1848, unu el la ĉefaj lakeoj de la oficiala ekonomia scienco, James Wilson, en sia polemiko kontraŭ la dekhor-leĝo, en la *London Economist*, denove trumpetis la saman himnon.

---

20) Kiam en la jaro 1848 la dekhora leĝo estis decidita en la parlamento, la fabrikistoj trudis al kelkaj laboristoj en la kamparaj ŝpinejoj situantaj inter la graflandoj Dorset kaj Somerset subskribi kontraŭpeticion, en kiu i.a. legeblas: „Viaj petantoj, gepatroj, kredas ke kroma nenifara horo ne povas havi alian sukceson ol demoraliziĝon de la infanoj, ĉar nenifarado estas komenco de ĉia malvirto.” Pri tio la fabrikraporto de la 31-a de oktobro 1848 diras: „La atmosfero de la ŝpinejoj, en kiuj la infanoj de tiuj virte teneraj gepatroj laboras, estas plena de tiom sennombraj polvo- kaj fibro-partikuletoj de la krudmaterialo, ke estas eksterordinare malagrable pasigi eĉ nur 10 minutojn en la ŝpinejoj, oni ne povas tion sen la plej malagrabla sento, ĉar okulo, orelo, naztruoj kaj buŝo tuj pleniĝas de nuboj el linpolveroj, el kiuj ne eblas eskapi. La laboro mem postulas, pro la febra hasto de la maŝinaro, senĉesan elspezon de lerteco kaj de moviĝo, sub la kontrolo de neniam laciĝanta atento, kaj ŝajnas iom kruele igi la gepatrojn apliki al siaj propraj infanoj la esprimon „nenifarado”, kiuj, post subtraho de la manĝotempo, estas forĝitaj 10 plenajn horojn al tia okupiĝo, en tia atmosfero. … Tiuj infanoj laboras pli longe ol la kampservistoj en la apudaj vilaĝoj … Tia senkora gurdado pri «nenifarado kaj malvirto» devas esti denuncata kiel slangaĉo [en la originalo angle: cant. -vl] kaj kiel plej senhonta hipokritaĵo. … Tiu parto el la publiko kiu, antaŭ proksimume dek du jaroj, estis konsternita de la sereneco, per kiu oni publike kaj tute serioze deklaris, sub protekto de alta aŭtoritato, ke la tuta „pura gajno” de la fabrikisto fluas el „la lasta horo” kaj ke do la redukto de la labortago je unu horo neniigas la netan gajnon; tiu parto de la publiko apenaŭ kredos siajn okulojn se ĝi nun legas ke la originala malkovro de la virtoj de la „lasta horo” estas nun ankoraŭ plibonigita per samgrada inkludo de „moralo” kaj „profito”; tiel ke, se la daŭro de la infanlaboro reduktiĝas al plenaj 10 horoj, la moralo de la infanoj perdiĝas same kiel la neta gajno de iliaj dungistoj, ĉar ambaŭ dependas de tiu lasta, tiu fatala horo.” („Repts. of Insp. of Fact. for 31th Oct. 1848”, p. 101) La sama fabrikraporto donas poste ekzemplojn de la „moralo” kaj „virto” de tiuj sinjoroj fabrikistoj, pri la trukoj, ruzaĵoj, logaĵoj kaj minacoj, falsadoj ktp kiujn ili aplikis por igi malmultajn tute sendefendajn laboristojn subskribi tiajn peticiojn, por poste prezenti ilin al la parlamento kiel peticioj de tuta industribranĉo. – Restas plej karakterize por la hodiaŭa stato de la tiel nomata ekonomia „scienco”, ke nek Senior mem, kiu poste – ni menciu tion je lia honoro – elpaŝis por la fabrikleĝaro, nek liaj originaj kaj

## 4. La plusprodukto

Tiun parton de la produkto kiu reprezentas la plusvaloron ($^{1}/_{10}$ de 20 funtoj da fadeno aŭ 2 funtoj da fadeno en la ekzemplo sub 2), ni nomas plusprodukto (surplus produce, produit net). Kiel la kvoto de la plusvaloro estos determinata de sia proporcio ne al la tuta sumo, sed al la varia parto de la kapitalo, tiel la sumo de la plusprodukto estas determinata de ĝia proporcio ne al la resto de la tuta produkto, sed al la produktparto en kiu prezentiĝas la necesa laboro. Kiel la produktado de plusvaloro estas la determinanta celo de la kapitalisma produktado, tiel ne la absoluta grando de la produkto, sed la relativa grando de la plusprodukto mezuras la altecgradon de la riĉaĵo.[58]

---

postaj kontraŭuloj, sciis klarigi la malĝustajn konkludojn de la «origina malkovro». Ili alvokis la faktan sperton. La kialo kaj la por kio [*En la originalo:* „Das why und wherefore”. -vl] restis mistero.

57 La sinjoro profesoro tamen profitis iom ĉe sia ekskurso al Manĉestro! En la „Letters on the Factory Act” la tuta neta gajno, „profito” kaj „interezo” kaj eĉ „io plia” [En la originalo angle: „something more”] dependas de unu nepagata laborhoro de la laboristo! Jaron antaŭe, en siaj „Outlines of Political Economy”, verkitaj por la instruo de oksfordaj studentoj kaj kleraj filistroj, li ankoraŭ „malkovris”, kontraŭ Ricardo kaj ties determinado de la valoro per la labortempo, ke la profito devenas el la laboro de la kapitalisto kaj la interezo el lia asketismo, el lia „sindetenemo”. Tiu blago estis jam malnova, sed la vorto „sindetenemo” nova. S-ro Roscher germanigas ĝin ĝuste per „Enthaltung”. Liaj samlandanoj pli aŭ malpli sciantaj la latinan lingvon, kiel Wirt, Schulze kaj aliaj germanoj, monaĥigis ĝin en „forrifuzo” [originale: „Entsagung”, ankaŭ tradukebla per „abdiko je la mondo” -vl].

58 „Por individuo kun kapitalo de 20.000 sterlingaj pundoj, kies profitoj estas 2.000 st.pd. jare, estus tute indiferenta afero ĉu lia kapitalo dungas 100 aŭ 1.000 laboristojn, ĉu la produktitaj varoj vendiĝas je 10.000 aŭ je 20.000 st.pd., ĉiam sub la kondiĉo ke liaj profitoj ĉiukaze ne falu sub 2.000 st.pd. Ĉu la reala intereso de nacio ne estas la sama? Kondiĉe ke ĝia reala neta enspezo, ĝiaj rentoj kaj profitoj restu samaj, tiam tute ne gravas ĉu la nacio konsistas el 10 aŭ el 12 milionoj da loĝantoj.” (Ricardo, l.c., p. 416) Longan tempon antaŭ Ricardo, fanatikulo pri plusprodukto, Arthur Young, cetere vortlaksa senkritika verkisto, kies famo staras en inversa proporcio al sia merito, diris i.a.: „kian utilon havus en moderna reĝlando tuta provinco kies grundo estus kultivata, eĉ se bone, en malnovromia maniero, de etaj, sendependaj kampuloj? Por kiu celo, krom la sola, produkti homojn (the mere purpose of breeding men), kio per si mem estas plej senutila celo (is a most useless purpose).” (Arthur Young, „Political Arithmetic etc.”, Londono, 1774, p. 47)

*Aldono al tiu ĉi noto:* Stranga estas „la forta emo prezenti la netan enspezon

La sumo de la necesa laboro kaj de la pluslaboro, de la tempaj sekcioj en kiuj la laboristo produktas la anstataŭan valoron de sia laborforto kaj la plusvaloron, estas la absoluta grando de lia labortempo – la labortago (working day).

kiel avantaĝan por la laborista klaso, … sed ĉi tio evidentas ke tio ne estas avantaĝa, ĉar ĝi estas neta”. (Th. Hopkins, „On Rent of Land etc.”, Londono, 1828, p. 126)

## *OKA ĈAPITRO – La labortago*

# 1. La limoj de la labortago

Ni bazis nin sur la kondiĉo ke la laborforto aĉetiĝas kaj vendiĝas je sia valoro. Ĝia valoro, kiel tiu de ĉiu alia varo, estas determinata de la labortempo necesa por ĝia produktado. Do, se la produktado de la mezumaj ĉiutagaj vivrimedoj de la laboristo bezonas 6 horojn, tiam li devas labori mezume 6 horojn tage por produkti ĉiutage sian laborforton aŭ por reprodukti la valoron ricevitan per ĝia vendo. La necesa parto de lia labortago estas tiam 6 horoj kaj estas do, ĉe alie senŝanĝaj kondiĉoj, donita grando. Sed per tio la grando de la labortago estas ankoraŭ ne donita.

Ni supozu, ke la linio a______b reprezentas la daŭron aŭ longecon de la necesa labortempo, ekz-e 6 horojn. Laŭ tio, ĉu la laboro estas longigita trans a_b je 1, 3 aŭ 6 horoj ktp, ni ricevas jenajn 3 diversajn liniojn:

labortago 1: a______b_c,

labortago 2: a______b___c,

labortago 3: a______b______c,

kiuj reprezentas tri diversajn labortagojn de 7, 9 kaj 12 horoj. La linio de plilongigo b_c reprezentas la longon de la plia laboro. Ĉar la labortago = a_b + b_c, ĝi varias kun la varia grando b_c. Ĉar a_b estas donita, la proporcio de b_c al a_b estas ĉiam mezurebla. Ĝi estas en labortago 1: $^{1}/_{6}$, en labortago 2: $^{3}/_{6}$ kaj en labortago 3: $^{6}/_{6}$ de a_b. Ĉar krome la proporcio $^{(pluslabortempo)}/_{(necesa\ labortempo)}$ determinas la kvoton de la plusvaloro, tiu estas donita per tiu proporcio. Ĝi estas en la tri diversaj labortagoj respektive $16^{2}/_{3}$, 50 kaj 100 %. Inverse la kvoto de plusvaloro ne donus al ni la grandon de la labortago. Se ĝi estus ekz-e 100 %, tiam la labortago povus esti 8-, 10-, 12-hora ktp. Ĝi indikus ke la du partoj de la labortagoj, necesa laboro kaj pluslaboro, estas same grandaj, sed ne, kiom granda ĉiu el tiuj partoj estas.

La labortago do ne estas konstanta, sed varia grando. Unu el ĝiaj partoj estas ja determinata de la labortempo necesa por la konstanta reproduktiĝo de la laboristo mem, sed ĝia ĉioma grando ŝanĝiĝas kun la longo aŭ daŭro de la plusvaloro. La labortago estas do determinebla, sed ĝi estas, per si mem, nedeterminita.[59]

---

59 „Labortago estas nedeterminita grando, ĝi povas esti longa aŭ mallonga." („An Essay on Trade and Commerce, containing Observations on Taxation etc.", Londono, 1770, p. 73)

Kvankam la labortago ne estas fiksa, sed flua grando, ĝi povas aliflanke varii nur ene de certaj limoj. Ĝia minimuma limo estas tamen nedeterminebla. Sed, se ni metas la plilongigan linion b_c, aŭ la pluslaboron, = 0, tiam ni ricevas minimuman limon, nome la parton de la tago, dum kiu la laboristo devas nepre labori por sia memkonserviĝo. Sed surbaze de la kapitalisma produktadmaniero la necesa laboro povas konsistigi nur parton de la labortago, la labortago povas do neniam mallongiĝi al tiu minimumo. Sed la labortago ja posedas maksimuman limon. Ĝi estas trans certa limo ne plilongigebla. Tiu maksimuma limo estas duoble determinita. Unue per la korpa limo de la laborforto. Homo povas dum la natura tago de 24 horoj elspezi nur certan kvanton da vivforto. Tiel, ĉevalo povas labori ĉiutage nur 8 horojn. Dum parto de la tago la forto devas ripozi, dormi, dum en alia parto la homo devas kontentigi korpajn bezonojn, sin nutri, purigi, vesti ktp. Ekster tiu pure korpa limo la plilongigo de la labortago renkontas moralajn limojn. La laboristo bezonas tempon por kontentigi spiritajn kaj sociajn bezonojn, kies amplekso kaj nombro estas determinataj de la ĝenerala kulturstato. La variado de la labortago moviĝas do ene de korpaj kaj sociaj limoj. Sed ambaŭ limoj estas tre elastaj kaj permesas la plej grandan agospacon. Ekz-e ni trovas labortagojn de 8, 10, 12, 14, 16, 18 horoj, do de plej diversa longo.

La kapitalisto aĉetis la laborforton je ties tagvaloro. Ĝia uzvaloro apartenas al li dum unu labortago. Li akiris do la rajton laborigi la laboriston dum unu tago por si. Sed kio estas labortago?[60] Ĉiukaze malpli ol natura vivtago. Je kiom? La kapitalisto havas sian propran opinion pri tiu lasta limo[61], la nepra limo de la labortago. Kiel kapitalisto li estas nur personigita kapitalo. Lia animo estas la kapitalanimo. Sed la kapitalo havas sian propran vivinstinkton, la instinkton plivaloriĝi, krei plusvaloron, sorbi, per sia konstanta parto, la produktadrimedoj, la kiom eble plej grandan kvanton da pluslaboro.[62] La kapitalo estas mortinta laboro, kiu nur vampire reviviĝas per ensorbo de viva laboro kaj vivas des pli, ju pli ĝi sorbas da ĝi. La tempo, dum kiu la laboristo laboras, estas la tempo,

60 Tiu ĉi demando estas senfine pli grava ol la fama demando de Sir Robert Peel al la komerca ĉambro de Birminghamo: *„Kio estas pundo?”* [En la originalo: „What is a pound?” -vl], demando farebla nur ĉar Peel estis pri la naturo de la mono same nescia kiel la „little shilling men” de Birminghamo.

61 *En la originalo:* „ultima Thule”. -vl

62 „Estas la tasko de la kapitalisto eltiri per la elspezita kapitalo la kiom eble plej grandan sumon da laboro.” („D'obtenir du capital dépensé la plus forte somme de travail possible.”) (J.-G. Courcelle-Seneuil, „Traité théorique et pratique des entreprises industrielles”, 2ème édit., 1857, p. 62)

dum kiu la kapitalisto konsumas la laborforton kiun li aĉetis.[63] Se la laboristo konsumas sian disponeblan tempon por si mem, tiam li priŝtelas la kapitaliston.[64]

La kapitalisto alvokas do la leĝon de varinterŝanĝo. Li, kiel ĉiu alia aĉetanto, provas eltiri la kiom eble plej grandan utilon el la uzvaloro de sia varo. Sed subite leviĝas la voĉo de la laboristo, kiu en la urĝo kaj bruo de la produktadprocezo mutiĝis:

La varo, kiun mi vendis al vi, distingiĝas disde la alia varplebo per tio ke ĝia uzado kreas valoron kaj pli grandan valoron ol ĝi mem kostas. Tio estis la kialo pro kiu vi aĉetis ĝin. Kio ĉe la unua flanko aperas kiel plivalorigo de kapitalo, estas ĉe mia flanko kroma elspezo de laborforto. Vi kaj mi konas sur la merkato nur unu leĝon, tiun de la varinterŝanĝo. Kaj la konsumado de la varo apartenas ne al la vendanto, kiu vendas ĝin, sed al la aĉetanto, kiu akiras ĝin. Do, la uzado de mia ĉiutaga laborforto apartenas al vi. Sed per ĝia ĉiutaga vendoprezo mi devas povi ĉiutage reprodukti kaj pro tio denove vendi ĝin. Sen konsideri la naturan eluziĝon per maljuniĝo ktp, mi devas kapabli labori morgaŭ per la sama normala stato de forto, sano kaj freŝeco kiel hodiaŭ. Vi konstante predikas al mi la evangelion de „ŝparemo” kaj „ŝindeteno”. Nu bone! Mi volas mastrumi mian solan havaĵon, la laborforton, kiel racia, ŝparema mastrumanto, kaj rezigni pri ĉia neracia malŝparo de ĝi. Mi volas ĉiutage fluigi, transformi en laboron, nur tiom da ĝi, kiom kongruas kun ĝia normala daŭro kaj sana disvolviĝo. Per senmezura longigo de la labortago vi povas en unu tago fluigi pli grandan kvanton de mia laborforto ol mi povas anstataŭigi en tri tagoj. Kiom vi tiel gajnas je laboro, tiom mi perdas je laborsubstanco. La uzado de mia laborforto kaj ĝia priŝtelado estas du tute diversaj aferoj. Se la mezuma periodo, dum kiu mezuma laboristo ĉe racia labormezuro povas vivi, estas 30 jaroj, tiam la valoro de mia laborforto, kiun vi pagas al mi de unu tago al alia, estas $^1/_{365}$ x 30 aŭ $^1/_{10950}$ de ĝia ĉiomvaloro. Sed se vi konsumas ĝin en 10 jaroj, tiam vi pagas al mi tage $^1/_{10950}$ anstataŭ $^1/_{3650}$ da ĝia ĉiomvaloro, do nur $^1/_3$ de ĝia tagvaloro, kaj do ŝtelas al mi ĉiutage $^2/_3$ de la valoro de mia varo. Vi pagas al mi unutagan laborforton, kie vi

63 „La perdo de unu laborhoro tage prezentas eksterordinare grandan malutilon por komerca ŝtato.” „La konsumado de luksaj varoj estas tre granda inter la laborantaj malriĉuloj de tiu ĉi reĝlando; speciale inter la manufaktur a plebo; sed ĉe tio ili konsumas ankaŭ sian tempon, konsumo pli fatala ol ĉiu alia.” („An Essay on Trade and Commerce etc.”, p. 47 kaj 153)

64 „Se la libera taglaboristo dum momento ripozas, tiam la fiekonomio, kiu sekvas lin per maltrankvilaj okuloj, asertas ke li priŝtelas ĝin.” (N. Linguet, „Théorie des Loix Civiles etc.”, Londono, 1767, vol. II, p. 466)

uzas tritagan. Tio estas kontraŭ nia kontrakto kaj la leĝo de varinterŝanĝo. Mi postulas do labortagon de normala longo, kaj mi postulas ĝin sen alvoki vian koron, ĉar en monaferoj ĉesas la familiareco. Vi povas esti modela civitano, eble membro de la asocio por animalprotektado kaj krome preskaŭ sankta, sed la aĵo, kiun vi reprezentas antaŭ mi, ne havas koron en sia brusto. Kio ŝajnas bati en ĝi, tio estas mia propra korbato. Mi postulas la normalan labortagon, ĉar mi postulas la valoron de mia varo, kiel ĉiu alia vendisto.[65]

Oni vidas: aparte de tute elastaj limoj, la naturo de la varinterŝanĝo mem ne donas limon de la labortago, do ne limon de la pluslaboro. La kapitalisto certigas sian rajton de aĉetanto kiam li provas kiom eble plej longigi la labortagon kaj, se eble, fari el unu labortago du. Aliflanke la specifa naturo de la vendita varo inkludas limon de ĝia konsumado fare de la aĉetanto, kaj la laboristo certigas sian rajton de vendanto, se li volas limigi la labortagon al certa normala grando. Ĉi tie do okazas antinomio, rajto kontraŭ rajto, ambaŭ same sigelitaj per la leĝo de varinterŝanĝo. Inter samaj rajtoj decidas la forto. Kaj tiel, en la historio de la kapitalisma produktado, la normado de la labortago prezentiĝas kiel batalo pri la limoj de la labortago – batalo inter la ĉiomkapitalisto, t.e. la klaso de la kapitalistoj, kaj la ĉiomlaboristo, aŭ laborista klaso.

## 2. La malsatego je pluslaboro. Fabrikisto kaj bojaro

La kapitalo ne inventis la pluslaboron. Ĉie, kie parto de la socio havas la monopolon de la produktadrimedoj, la laboristo, ĉu libera aŭ ne libera, devas aldoni al la labortempo necesa por lia memkonserviĝo kroman labortempon por produkti la vivrimedojn por la proprietulo de la produktadrimedoj[66], egale ĉu tiu proprietulo estas atena aristokrato[67], etruska teo-

65 Dum la granda striko de la Londona konstrulaboristoj, 1860-1861 por reduktado de la labortago al 9 horoj, ilia komitato publikigis deklaron kiu pli aŭ malpli kongruas kun la pledo de nia laboristo. La deklaro aludas ne sen ironio, ke la plej profitavida konstru-entreprenisto [orig.: „building masters” -vl] – iu Sir M. Peto – kiu poste famiĝis pro sia giganta bankroto, estis konsiderata preskaŭ sanktulo.

66 „Tiuj, kiuj laboras …, en realo nutras kaj la pensiulojn, nomatajn la riĉuloj, kaj sin mem.” (Edmund Burke, l.c., p. 2, 3)

67 *En la originalo:* καλὸς κ'ἀγαθός [greke: kalos k'agathos] <Aristokrat> -vl

krato, romia civitano[68], normanda barono, usona sklavisto, valaĥa bojaro, moderna terluigisto aŭ kapitalisto.[69] Tamen evidentas, ke, se en ekonomia sociordo antaŭrangas ne la interŝanĝvaloro, sed la uzvaloro de la produkto, la pluslaboro estas limigita de pli aŭ malpli ampleksa aro da bezonoj, sed ke nenia senlima bezono je pluslaboro fontas el la karaktero de la produktado mem. Pro tio, en la antikva erao la pluslaboro montriĝis terura kie temis pri akiro de la interŝanĝvaloro en ties memstara monformo, en la produktado de oro kaj arĝento. Perforta mortiga laboro estis tie la oficiala formo de trolaboro. Sufiĉas legi Diodoron Sikulo[70].[71] Tamen tio estas esceptoj en la antikva mondo. Sed ekde kiam popoloj, kies produktado troviĝas ankoraŭ en la malaltaj formoj de sklavlaboro, servutlaboro ktp, estas entirataj en mondmerkaton dominatan de la kapitalisma produktadmaniero, kiu disvolvas kiel antaŭrangan intereson la vendon de siaj produktoj eksterlanden, tiam greftiĝas al la barbaraj kruelaĵoj de sklaveco, servuteco ktp la civilizita kruelaĵo de trolaborado. Pro tio, la nigrula laboro en la sudaj ŝtatoj de Usono konservis modere patriarĥan karakteron, tiom longe kiom la produktado estis orientita ĉefe al la rekta membezono. Sed samgrade kiel la kotoneksporto fariĝis vivintereso de tiuj ŝtatoj, la trolaborado de la nigrulo – ie kaj tie la konsumado de lia vivo en sep laborjaroj – fariĝis faktoro de kalkulita kaj kalkulanta sistemo. Jam ne temis pri tio, eltiri el li certan kvanton da utilaj produktoj. Temis nun pri produktado de la plusvaloro mem. Same okazis pri la servutlaboro, ekz-e en la danubaj princlandoj.

Kompari la malsategon je pluslaboro en la danubaj princlandoj kun la sama malsatego en anglaj fabrikoj estas aparte interese, ĉar la pluslaboro posedas en la servutlaboro memstaran, sense percepteblan formon.

---

68 *En la originalo:* civis romanus <römischer Bürger> -vl

69 Niebuhr diras en sia „Römische Gechichte” [Historio de Romo -vl] tre naive: „Oni ne povas kaŝi al si, ke verkoj kiel la etruskaj, kiuj mirigas en siaj ruinoj, en malgrandaj (!) ŝtatoj antaŭkondiĉas feŭdajn sinjorojn kaj servistojn.” Sismondi diris pli trafe ke „Bruselaj puntoj” antaŭkondiĉas salajromastrojn kaj salajroservistojn.

70 *En la originalo:* Diodorus Siculus. -vl

71 „Oni ne povas rigardi tiujn malfeliĉulojn (en la orminejoj inter Egiptio, Etiopio kaj Arabio), kiuj eĉ ne povas teni sian korpon pura nek kovri sian nudecon, sen kompati ilian lamentindan sorton. Ĉar tie ne okazas indulgo nek domaĝo de malsanuloj, kadukuloj, maljunuloj, la virina malforteco. Ĉiuj devas, devigataj de batoj, plu labori ĝis kiam la morto ĉesigas iliajn turmentojn kaj ilian mizeron.” (Diod. Sic., „Historische Bibliothek”, Buch 3, c. 13, [p. 260])

Ni supozu ke la labortago havas 6 horojn da necesa laboro kaj 6 horojn da pluslaboro. Tiam la libera laboristo liveras al la kapitalisto semajne 6 x 6 aŭ 36 horojn da plusvaloro. Estas same kvazaŭ li laborus dum 3 tagoj semajne por si kaj dum 3 tagoj semajne senpage por la kapitalisto. Sed tio ne estas videbla. Pluslaboro kaj necesa laboro intermiksiĝas. Mi povas esprimi la saman proporcion ankaŭ ekz-e tiel, ke la laboristo laboras en ĉiu minuto 30 sekundojn por si kaj 30 sekundojn por la kapitalisto, ktp. Alie statas pri la servutlaboro. La necesa laboro, kiun ekz-e la valaĥa terkulturisto faras por sia memkonserviĝo, estas space disigita disde lia pluslaboro por la bojaro. La unuan li faras sur sia propra kampo, la alian sur la feŭda bieno. Pro tio, la du partoj de la labortempo ekzistas sendepende unu apud la alia. En la formo de servutlaboro la pluslaboro estas precize disigita disde la necesa laboro. Tiu diversa aperformo evidente ŝanĝas neniom ĉe la kvanta proporcio de pluslaboro kaj necesa laboro. Tri tagoj da pluslaboro semajne restas tri tagoj da laboro kiuj ne estigas ekvivalenton por la laboristo mem, egale ĉu ĝi nomiĝas servutlaboro aŭ dunglaboro. Sed ĉe la kapitalisto la malsatego je pluslaboro aperas en la impulso je senmezura longigo de la labortago, ĉe la bojaro pli simple en rekta ĉasado de servutlaboraj tagoj.[72]

La servutlaboro estis en la danubaj princlandoj ligita kun naturaĵaj rentoj kaj ceteraj akcesoraĵoj de servuteco, sed konsistigis la decidan tributon al la reganta klaso. Kie tio estis la kazo, la servutlaboro estiĝis malofte el la servuteco, sed inverse, servuteco plej ofte el servutlaboro.[73] Tiel en la rumanaj provincoj.

Ĝia origina produktadmaniero estis bazita sur komuna proprieto, sed ne sur komuna proprieto en slava aŭ eĉ hinda formo. Parto de la landaro estis sendepende mastrumata kiel libera privatproprieto de la membroj de la

72 La sekvo rilatas al la situacio en la rumanaj provincoj antaŭ la grandaj ŝanĝoj ekde la krimea milito.

73 *Noto al la 3-a eldono:* Tio validas ankaŭ por Germanio kaj speciale por la orientelba Prusujo. En la 15-a jarcento la germana terkulturisto estis preskaŭ ĉie submetita al certaj rentoj en formo de produkto kaj de laboro, sed alie almenaŭ fakte libera homo. La germanaj koloniantoj en Brandenburgio, Pomerio, Silezio kaj Orienta Prusujo estis eĉ jure agnoskitaj liberuloj. La venko de la nobelaro en la kampula milito ĉesigis tion. Ne nur la venkitaj sudgermanaj terkulturistoj estis reservutigitaj. Jam ekde la mezo de la 16-a jarcento la orientprusaj, brandenburgiaj, pomeraj kaj sileziaj, kaj baldaŭ poste ankaŭ la ŝlesvig-holŝtejnaj liberaj kampuloj estis servutigitaj. (Maurer, „Fronhöfe”, IV. Bd. –Meitzen, „Der Boden des Pr. Staats”. – Hanssen, „Leibeigenschaft in Schleswig-Holstein”) – F. E.

komunumo, alia parto – la *ager publicus*[74] – komune. La produktoj de tiu komuna laboro servis parte kiel rezervfonduso por misrikoltoj kaj aliaj hazardaĵoj, parte kiel ŝtata trezoro por kovri la kostojn de milito, religio kaj aliaj komunumaj elspezoj. Iom post iom, militaj kaj ekleziaj eminentuloj uzurpis la komunan proprieton kaj samtempe ankaŭ la servojn por ĝi. La laboro de la liberaj terkulturistoj sur sia komuna tero transformiĝis en servutlaboron por la ŝtelintoj de la komunaj teroj. Per tio evoluis samtempe servutrilatoj, sed nur fakte, ne jure, ĝis kiam la mondliberiga Ruslando, sub la preteksto nuligi la servuton, deklaris ĝin leĝo. La kodekso de servutlaboro, kiun la rusa generalo Kiseljev en 1831 proklamis, estis kompreneble diktita de la bojaroj mem. Tiel Ruslando konkeris unufrape la magnatojn de la danubaj princlandoj kaj la aplaŭdon de la liberalaj kretenoj de tuta Eŭropo.

Laŭ la „Règlement organique”, tiel nomiĝas tiu kodekso de servutlaboro, ĉiu valaĥa terkulturisto ŝuldas, krom liverado de certa kvanto da detaligitaj naturaĵoj, al la tiel nomata grundproprietulo: 1. dek du labortagoj entute, 2. unu tagon da kamplaboro kaj 3. unu tagon da ligno-proviado. Ĉiome: 14 tagoj jare. Sed kun profunda kompreno de la politika ekonomio la labortago ne estas difinita en la ordinara senco, sed kiel labortago necesa por estigo de taga mezuma produkto. Sed la taga mezuma produkto estas ruze difinita tiel, ke neniu ciklopo pretigus ĝin en 24 horoj. Per la sekaj vortoj de aŭtente rusa ironio la „Règlement” klarigas do mem, ke 12 labortagojn oni komprenu kiel la produkton de manlaboro de 36 tagoj, unu tagon da kamplaboro kiel tri tagojn, kaj unu tagon da ligno-provizado ankaŭ la trioblon. Sume: 42 servutlaboraj tagoj. Sed aldoniĝas la tiel nomata *Jobagie*, servoj kiujn la grundsinjoro rajtas por eksterordinaraj produktadbezonoj. Proporcie al la nombro de ĝia loĝantaro, ĉiu vilaĝo devas jare disponigi certan kontingenton por *jobagie*. Tiu kroma servutlaboro estas taksata por ĉiu valaĥa kampulo je 14 tagoj. Tiel la preskribita servutlaboro estas je 56 labortagoj jare. Sed la kampkultura jaro havas en Valaĥio pro la malbona klimato nur 210 tagojn, el kiuj 40 estas dekalkulendaj kiel dimanĉoj kaj festtagoj, 30 mezume pro malbonega vetero, sume 70 tagoj. Restas 140 labortagoj. La proporcio de servutlaboro al necesa laboro, $^{56}/_{84}$ aŭ $66^{2}/_{3}$ elcentoj, esprimas multe pli malgrandan kvoton de pluslaboro ol tiu, kiu reguligas la laboron de la angla terkultura aŭ fabrika laboristo. Sed tio estas nur la leĝe preskribita servutlaboro. Kaj en eĉ pli „liberala” spirito ol la angla fabrikleĝaro, la „Règlement organique” sciis faciligi sian propran evitadon. Post fari el 12 tagoj 54, la nominala taglaboro de ĉiu el la 54 servutlaboraj tagoj estas

74 La komuna, „publika” kampo. -vl

tiel difinita ke restanta parto devas sekvi en la sekvantaj tagoj. En unu tago ekz-e de terpeco la trudherboj devas esti elsarkitaj, kio, speciale ĉe maizo, bezonas duoblan tempon. La leĝa taglaboro estas por kelkaj specoj de kampkultura laboro interpretebla tiel ke la tago komenciĝas en majo kaj finiĝas en oktobro. Por Moldavio la kondiĉoj estas ankoraŭ pli akraj.

> „La dek du servutlaboraj tagoj de la Règlement organique", elkriis venkebria bojaro, „sumiĝas je 365 tagoj jare!"[75]

Se la *Règlement organique* de la danubaj princlandoj estis pozitiva esprimo de la malsatego je pluslaboro, kiun ĉiu paragrafo laŭleĝigas, la anglaj fabrikleĝoj estas negativaj esprimoj de la sama malsatego. Tiuj leĝoj bridas la impeton de la kapitalo al senmezura elsuĉado de la laborforto, pere de ŝtata perforta limigo de la labortago, kaj pli precize fare de ŝtato kiun regas kapitalisto kaj terluiganto. Krom pro la ĉiutage pli minace kreskanta laborista movado, la limigo de la fabriklaboro estis diktita de la sama neceso kiu elverŝis la guano-sterkon sur la anglajn kampojn. La sama blinda rabavido, kiu en tiu kazo elĉerpis la grundon, en la alia kazo ronĝis la radikojn de la vivaj fortoj de la nacio. Periode revenantaj epidemioj parolis tie same klare kiel la malkreskanta alteco de la soldatoj en Germanio kaj Francio.[76]

La nun (1867) valida fabrikleĝo de 1850 permesas por la mezuma semajntago 10 horojn, nome por la unuaj 5 semajntagoj 12 horojn, de la

75 Pliaj detaloj troveblas en E. Regnault, „Histoire politique et sociale des Principautés Danubiennes", Parizo, 1855, [p. 304 sj]

76 „Ĝenerale kaj ene de certaj limoj, la transiro de meza grandeco de sia speco estas signo de prospero de organikaj estaĵoj. La korpa alteco de la homo malgrandiĝas, se ĝia prospero estas obstaklita ĉu de korpaj aŭ de sociaj kondiĉoj. En ĉiuj eŭropaj landoj en kiuj ekzistas konskripcio [speco de deviga militservo -vl], ekde ĝia enkonduko la mezuma korpalteco de la plenkreskaj viroj kaj entute ilia taŭgeco por militservo malkreskis. Antaŭ la revolucio (1789) la minimumo por la infanteriano en Francio estis 165 centimetroj; 1818 (leĝo de la 10-a de marto) 157, laŭ la leĝo de la 21-a de marto 1832, 156 centimetroj; en Francio, pro mankanta alteco kaj pro korpaj difektoj mezume pli ol la duono estas deklaritaj netaŭgaj por militservo. La milita altecmezuro estis en Saksio 1780: 178 centimetroj, nun 155. En Prusio ĝi estas 157. Laŭ indikoj de la „Bayrische Zeitung" de la 9-a de majo 1862 de D-ro Meyer montriĝis laŭ 9-jara mezumo, ke en Prusio el 1.000 konskripciitoj 716 estis ne taŭgaj por la militservo: 317 pro mankanta alteco kaj 399 pro korpaj difektoj … Berlino en 1858 ne povis disponigi sian kontingenton de anstataŭantoj, ĉar mankis 156 viroj." (J. v. Liebig, „Die Chemie in ihrer Anwendung auf Agrikultur und Physiologie [La ĥemio en sia aplikado al kampkulturo kaj fiziologio]", 1862, 7-a eld., Vol. I, p. 117, 118)

6-a mateno ĝis la 6-a vespere, el kiuj tamen $^{1}/_{2}$ horo por matenmanĝo kaj unu horo por tagmanĝo estas leĝe preskribitaj, do restas $10^{1}/_{2}$ laborhoroj, kaj 8 horojn por la sabato, de la 6-a matene ĝis la 2-a posttagmeze, el kiuj $^{1}/_{2}$ horo por matenmanĝo dekalkulendas. Restas 60 laborhoroj, $10^{1}/_{2}$ por la unuaj kvin semajntagoj, $7^{1}/_{2}$ por la lasta semajntago.[77] Oni enoficigis kelkajn gardantojn de tiu leĝo, la fabrikinspektistojn, kiuj estas rekte subordigitaj al la ministrejo pri internaj aferoj kaj kies raportoj estas duonjare publikigata laŭ ordono de la parlamento. Ili liveras do kontinuan kaj oficialan statistikon pri la kapitalista malsatego je pluslaboro.

Ni aŭskultu por momento la fabrikinspektistojn.[78]

> „La trompa fabrikisto komencas la laboron kvaronhoron, kelkfoje pli frue, kelkfoje malpli frue, antaŭ la sesa horo matene kaj fermas ĝin kvaronhoron, kelkfoje pli frue, kelkfoje pli malfrue, posttagmeze. Li forprenas 5 minutojn de la komenco kaj de la fino de la nominale preskribita duona horo, kaj forprenas 10 minutojn komence kaj fine de la horo por la tagmanĝo. Sabate li laboras kvaronhoron, kelkfoje pli, kelkfoje malpli, post la 2-a horo posttagmeze. Tiel lia gajno estas:

| | |
|---|---|
| Antaŭ la 6-a matene: | 15 minutoj |
| Post la 6-a posttagm.: | 15 minutoj |
| Ĉe matenmanĝo: | 10 minutoj |

77 La historio de la fabrikleĝo de 1850 sekvas en tiu ĉi ĉapitro.

78 La periodon de la komenco de la granda industrio en Anglio ĝis 1845 mi tuŝas nur ie kaj tie. Por tiu periodo mi rekomendas al la leganto la libron „Die Lage der arbeitenden Klasse in England [La situacio de la laboranta klaso en Anglio]" de Friedrich Engels [Frederiko Engelso], Lepsiko, 1845 <Vidu MEW, vol. 2>. Kiom profunde Engelso komprenis la spiriton de la kapitalisma produktadmaniero, tion montras la fabrikraportoj, raportoj pri minejoj ktp, kiuj aperis ekde 1845, kaj kiom mirinde li detale pentris la kondiĉojn, tion montras jam la plej supraĵa komparo de lia verko kun la 18 ĝis 20 jarojn poste publikigitaj oficialaj raportoj de la Children's Employment Commission [Komisiono pri infandungo -vl] (1863-1867). Tiuj temas pri industribranĉoj, en kiuj la fabrikleĝaro ĝis 1862 ankoraŭ ne estis enkondukita, parte ankoraŭ nun ne estas enkondukita. Tie, la pli aŭ malpli grandaj ŝanĝoj de la kondiĉoj priskribitaj de Engelso ne estis truditaj de ekstera aŭtoritato. Mi pruntas miajn ekzemplojn ĉefe el la liberkomerca periodo post 1848, el tiu paradiza tempo el kiu same fanfaronaj kiel sensciaj liberkomercaj kolportistoj tiel fabele rakontas al la germanoj. – Cetere, Anglio ĉefrolas ĉi tie nur ĉar ĝi reprezentas klasike la kapitalisman produktadon kaj ĉar sole ĝi posedas oficialan kontinuan statistikon de la pritraktataj temoj.

| | |
|---|---|
| Ĉe tagmanĝo: | 20 minutoj |
| Sume: | 60 minutoj |
| Sumo en 5 tagoj: | 300 minutoj |

Sabate

| | |
|---|---|
| Antaŭ la 6-a matene: | 15 minutoj |
| Ĉe matenmanĝo: | 10 minutoj |
| Post la 2-a posttagm.: | 15 minutoj |
| Sume: | 40 minutoj |
| **Suma gajno en la semajno:** | **340 minutoj** |

Aŭ **5 horoj 40 minutoj** semajne, kio donas, obligite per 50 laborsemajnoj, kun dekalkulo de 2 semajnoj por festtagoj aŭ okazaj interrompoj: **27 labortagojn**."[79]

„Se la labortago estas ĉiutage longigita je 5 minutoj trans la normala daŭro, tiam tio donas $2^{1}/_{2}$ produktadaj tagoj jare."[80] „Kroma horo ĉiutage, gajnita per tio, ke oni jen kaptas pecon da tempo, jen alian pecon, faras el la 12 monatoj de la jaro 13."[81]

Krizoj, dum kiuj la produktado interrompiĝas kaj en kiuj oni laboras nur „mallongan tempon", nur dum kelkaj tagoj de la semajno, kompreneble neniom ŝanĝas la instinkton je plilongigo de la labortago. Ju malpli da aferoj fareblas, des pli granda devas esti la gajno ĉe la farata afero. Ju malpli da tempo estas por labori, des pli da pluslabora tempo devas esti por labori. Tiel, la fabrikinspektistoj raportas pri la kriza periodo de 1857 ĝis 1858:

„Oni povus pensi ke estas malkonsekvenco, ke ia trolaborado okazas en tempo dum kiu la komerco fluas tiel malbone, sed ĝia malbona stato spronas senrespektajn homojn al ekscesoj; ili tiel certigas al si kromprofiton …" „En

79 „Suggestions etc. by Mr. L. Horner, Inspector of Factories", en „Factories Regulation Act. Ordered by the House of Commons to be printed 9. Aug. 1859", p. 4, 5. [Grasigoj en la teksto de la tradukinto. -vl]

80 „Reports of the Insp. of Fact. for the half year, Oct. 1856", p. 35.

81 „Report etc. 30th April 1858", p. 9.

la sama tempo", diras Leonard Horner, „kiam 122 fabrikoj en mia distrikto estas tute forlasitaj, 143 ne laboras kaj aliaj laboras mallongan tempon, la kromlaboro trans la leĝe difinita tempo estas daŭrigata."[82]

„Kvankam", diras s-ro Howell, „en la plej multaj fabrikoj pro la malbona aferstato oni laboras nur duontempe, mi daŭre ricevas la saman kvanton da plendoj, ke duona horo aŭ 3/4 oroj tage estas forkaptitaj (snatched) al la laboristoj per detranĉoj el la leĝe garantiitaj tempoj por manĝo kaj ripozo."[83]

La sama fenomeno ripetiĝas malpli grandskale dum la terura kotonkrizo de 1861 ĝis 1865.[84]

„Oni kelkfoje pretekstas, kiam ni surprizas laboristojn dum la manĝhoroj aŭ dum aliaj kontraŭleĝaj tempoj ĉe laboro, ke ili tute ne volas forlasi la fabrikon kaj ke necesas uzi forton por interrompi ilian laboron" (purigadon de maŝinoj ktp), „speciale sabate. Sed se la «manoj» post haltigo de la maŝinaro restas en la fabriko, tio okazas nur ĉar oni ne permesis al ili tempon por plenumi tiajn farojn inter la 6-a matene kaj la 6-a vespere, ene de la leĝe fiksitaj laborhoroj."[85]

82 „Reports etc.", l.c., p. 10.

83 „Reporters etc.", l.c., p. 25.

84 „Reports etc. for the half year ending 30th April 1861." Vidu aldonon n-ro 2; „Reports etc. 31th Octob. 1862", p. 7, 52, 53. La detranĉoj refariĝas pli multnombraj en la lasta duonjaro 1863. Kp. „Reports etc. ending 31st Oct. 1863", p. 7.

85 „Reports etc. 31st Oct. 1960", p. 23. Kun kia fanatikeco, laŭ tribunalaj deklaroj de la fabrikistoj, iliaj fabrikmanoj kontraŭstaras ĉian interrompon de la fabriklaboro, montras la sekva kuriozaĵo: Komence de junio 1836 la tribunalo de Dewsbury (Jorkŝiro) ricevis denuncojn, laŭ kiuj la proprietuloj de 8 grandaj fabrikoj proksime de Batley rompis la fabrikleĝon. Parto de tiuj sinjoroj estis akuzita, esti laboriginta 5 knabojn de inter 12 kaj 15 jaroj de la 6-a matene de vendredo ĝis la 4-a posttagmeze de la sekva sabato, sen permesi al ili ian ajn ripozon krom por manĝoj kaj unu horon da dormo je noktomezo. Kaj tiuj infanoj devis plenumi la senĉesan 30-horan laboron en la „shoddyhole", kiel nomiĝas la kaverno, en kiu oni disŝiras lan-ĉifonojn kaj kie aermaro da polvo, defalaĵoj ktp devigas eĉ la plenkreskan laboriston konstante fermligi la buŝon per naztukoj, por protekti sian pulmon! La sinjoroj akuzitoj asertis anstataŭ ĵuro – kiel kvakeroj ili estis tro skrupule religiaj homoj por fari ĵuron –, ke ili en sia granda karitato permesis al la mizeraj infanoj 4 horojn da dormo, sed tiuj infanaj obstinuloj absolute ne volis enlitiĝi! La sinjoroj kvakeroj estis kondamnitaj je 20 sterlingaj pundoj da monpuno. Dryden antaŭsentis tiujn kvakerojn:

„Vulpo plena de hipokriteco,

kiu mensogas kiel diablo, sed timas la ĵuron,

> „La kromprofito farebla per kromlaboro trans la leĝe limigita tempo ŝajnas esti por multaj fabrikistoj tro granda tento ol povi rezisti ĝin. Ili kalkulas pri la ŝanco ne esti eltrovitaj, kaj kalkulas, ke eĉ en kazo de malkovro la malalteco de la monpunoj kaj de la tribunalaj kostoj tamen certigas pozitivan bilancon."[86] „Kie la kroma tempo estas gajnita iom post iom dum la tago per multigo de etaj ŝteloj (a multiplication of small thefts), la inspektistoj renkontas preskaŭ nesupereblajn malfacilaĵojn pruvi tion."[87]

Tiujn „etajn ŝtelojn" de la kapitalo je manĝo- kaj ripoz-tempo de la laboristo la fabrikinspektistoj nomas ankaŭ „petty pilferings of minutes", forŝtelado de minutoj[88], forkaptado de minutoj[89] aŭ, kiel la laboristoj nomas ĝin teĥnike, „nibbling and cribbling at meal times", „ronĝi kaj kapti ĉe manĝpaŭzoj".[90]

Kiel oni vidas, en tiu etoso la estigo de la plusvaloro per pluslaboro ne estas sekreto.

> „Se vi permesas al mi", diris tre respektinda fabrikmastro, „laborigi tage nur 10 minutojn da kromtempo, tiam vi enpoŝigas al mi jare 1.000 sterlingajn pundojn."[91] „Tempatomoj estas la elementoj de la gajno."[92]

Nenio estas tiurilate pli karakteriza ol la nomo donita al la laboristoj kiuj laboras plentempe: „full times" kaj tiu al la infanoj malpli ol 13-jaraĝaj, kiuj rajtas labori nur 6 horojn: „half times".[93]

La laboristo estas tie jam nenio alia ol personigita labortempo. Ĉiuj individuaj diferencoj solviĝas en la „plentempuloj" kaj „duontempuloj".

---

kiu aspektas kiel pentofaranto, sed flanken
ĵetas avidajn rigardojn,
sed ne kuraĝas peki, antaŭ
ol farinte preĝon!"

86 „Rep. etc. 31st Oct. 1856", p. 34.

87 l.c., p. 35.

88 l.c., p. 48.

89 saml.

90 saml.

91 l.c., p. 48.

92 „Moments are the elements of profit." („Rep. of the Insp. etc. 30th April 1860", p. 56.

93 La esprimo havas oficialan civitanrajton, en la fabriko kiel en la fabrikraportoj.

## 3. Anglaj industribranĉoj sen leĝa limo de ekspluatado

Ĝis nun ni observis la avidon je longigo de la labortago, la lupan malsategon je pluslaboro, sur kampo en kiu senmezuraj ekscesoj – ne superitaj, kiel diras burĝa angla ekonomikisto, de la kruelaĵoj de la hispanoj kontraŭ la ruĝhaŭtuloj de Ameriko[94] – fine kondukis al tio ke la kapitalo estis ligita al la kateno de leĝa regulado. Ni rigardu nun kelkajn produktadbranĉojn, kie la elsuĉado de laborforto aŭ estas daŭre libera de limigoj aŭ estis tia ankoraŭ hieraŭ.

> „S-ro Boroughton, provinca juĝisto[95], deklaris kiel prezidanto de publika kunveno en la urbohalo de Notinghamo, la 14-an de januaro 1860, ke en la parto de la urba loĝantaro dungita por puntfabrikado regas grado de sufero kaj malhavo nekonata en la cetera civilizita mondo … Je la 2-a, 3-a, 4-a matene infanoj de 9 ĝis 10 jaroj estas elŝirataj el siaj malpuraj litoj kaj devigataj labori, por la nuda vivteno, ĝis la 10-a, 11-a, 12-a horo nokte, dum iliaj membroj malfortiĝas, ilia figuro ŝrumpas kaj ilia homeco komplete rigidiĝas en ŝtonecan torporon, kies nura aspekto estas terura. Ni ne estas surprizitaj, ke s-ro Mallett kaj aliaj fabrikistoj elpaŝis por protesti kontraŭ ĉia diskutado … La sistemo, tia kia la pastro Montagu Valpy priskribis ĝin, estas sistemo de senlima sklavismo, sklavismo en socia, korpa, morala kaj intelekta rilato … Kion pensi pri urbo kiu okazigas publikan kunvenon por peticii ke la labortempo por viroj estu limigota al 18 horoj tage! … Ni protestas kontraŭ la virginiaj kaj karolinaj plantejmastroj. Sed ĉu ilia nigrulmerkato, kun ĉiaj hororoj de vipo kaj la komerco per homkarno estas pli abomeninda ol tiu ĉi malrapida hombuĉado, kiu okazas por ke fabrikiĝu vualo kaj kolumo por avantaĝo de kapitalistoj?[96]

La ceramikfabriko de Staffordshire estis en la lastaj 22 jaroj temo de tri parlamentaj esploroj. La rezultoj estas deponitaj en la raporto de s-ro Scriven de 1841 al la „Children's Employment Commissioners”, en la raporto de D-ro Greenhow de 1860, publikigitaj laŭ ordono de la kuracista oficisto de la Privy Council („Public Health, 3rd Report”, I, 102-113),

---

94 „La avido de la fabrikmastroj, kies kruelaĵoj ĉe ĉasado de profito estis apenaŭ superataj de tiuj, kiujn la hispanoj faris dum la konkero de Ameriko, ĉe la ĉasado de oro.” (John Wade, „History of the Middle and Working Classes”, 3rd ed., Londono, 1835, p. 114) La teoria parto de la libro, speco de kompendio de politika ekonomio, entenas por sia tempo originalajn teksterojn, ekz-e pri komercaj krizoj. La historia parto suferas senhontan plagiatismon el Sir M. Eden, „The State of the Poor”, Londono, 1797.

95 *En la originalo angle:* „County Magistrate”. -vl

96 London „Daily Telegraph”, 17-a de januaro 1860.

fine en la raporto de s-ro Longe de 1863, en „First Report of the Children's Employment Commission” de la 13-a de junio 1863. Por mia tasko sufiĉas prunti el la raportoj de 1860 kaj 1863 kelkajn atestajn deklarojn de la ekspluatitaj infanoj mem. El la infanoj oni povas konkludi pri la plenkreskuloj, nome knabinoj kaj virinoj, kaj pli precize en industribranĉo kompare kun kiu kotonŝpinado kaj similaj laboroj ŝajnas tre agrabla kaj sanfavora afero.[97]

Vilhelmo Wood[98], naŭjara, „havis 7 jarojn kaj 10 monatojn kiam li komencis labori”. Dekomence li „ran moulds” (portis la prete formitan varon en la sekigejon por poste reporti la malplenan formon). Li venas ĉiutage en la semajno je la 6-a horo matene kaj ĉesas proksimume la 9-an vespere. „Mi laboras ĝis la 9-a vespere ĉiun tagon en la semajno. Tiel ekz-e dum la lastaj 7-8 semajnoj.” Do dekkvinhora laboro por sepjara infano! M. Murray, dekdujara knabo, deklaras:

> „Mi *run moulds* kaj turnas la radon. Mi venas je la 6-a horo, kelkfoje je la 4-a matene. Mi laboris dum la tuta nokto ĝis ĉi-matene la 6-a horo. Mi ne estis en la lito de la lasta nokto. Krom mi laboras 8 aŭ 9 aliaj knaboj tra la tuta nokto. Ĉiuj escepte de unu revenis ĉi-matene. Mi ricevas semajne 3 ŝ. 6 d. [1 talero 5 groŝoj] Mi ne ricevas pli kiam mi tralaboras la tutan nokton. En la lasta semajno mi tralaboris du noktojn.”

Fernyhough, dekjara knabo:

> „Mi ne havas ĉiam tutan horon por tagmanĝi; ofte nur duonan horon; ĉiun ĵaûdon, vendredon kaj sabaton.”[99]

D-ro Greenhow taksas la vivtempon en la ceramikaj distriktoj de Stoke-upon-Trent kaj Wolstanton eksterordinare mallonga. Kvankam en la distrikto Stoke nur 36,6 % kaj en Wolstanton nur 30,4 % de la vira loĝantaro pli ol 20-jara estas dungita en la ceramikejoj, inter la viroj de tiu kategorio en la unua distrikto pli ol la duono, en la dua proksimume $^{2}/_{5}$ de la mortoj sekve al brustmalsanoj troviĝas inter la ceramikistoj. D-ro Boothroyd, praktikanta kuracisto en Haley, deklaras:

> „Ĉiu sinsekva generacio de ceramikistoj estas pli naneca kaj pli malforta ol la antaŭa.”

Same alia kuracisto, s-ro McBean:

---

97 Kp Engels, „Lage ktp”, p. 249-251. <Vidu vol. 2 de nia eldono, p. 423-

98 *En la originalo:* Wilhelm Wood; en la angla: William Wood. -vl

99 „Children's Employment Commission, First Report etc., 1863”, Appendix, p. 16, 19, 18.

„Ekde kiam mi komencis antaŭ 25 jaroj mian praktikadon ĉe la ceramikistoj, la okulfrapa degenerado de tiu klaso montriĝis progresanta en malpliiĝo de formo kaj de pezo."

Tiuj deklaroj estis prenitaj el la raporto de D-ro Greenhow de 1860.[100]

El la raporto de la komisaroj de 1863 la jeno: D-ro J. T. Arledge, ĉef-kuracisto de la malsanulejo de North Staffordshire, diras:

„Kiel klaso la ceramikistoj, viroj kaj virinoj …, montriĝas kiel degenerinta loĝantaro, korpe kaj morale. Ili estas ĝenerale naniĝintaj, malbone konstruitaj, kaj ofte miskreskintaj ĉe la brusto. Ili maljuniĝas antaŭtempe kaj estas mal-longvivaj; flegmaj kaj sensangaj, ili montras la malfortecon de sia konstitucio per obstinaj atakoj de dispepsio, hepataj kaj renaj misfunkcioj kaj reŭmatismo. Sed antaŭ ĉio ili estas submetitaj al brustmalsanoj, pneŭmonio, ftizo, bronĥito kaj astmo. Formo de tiu lasta estas propra al ili kaj konata sub la nomo de ceramikista astmo aŭ ceramikista ftizo. Skrofolo, kiu atakas migdalojn, ostojn aŭ aliajn korpopartojn, estas malsano de pli ol du trionoj de la ceramikistoj. Ke la degenero de la loĝantaro de tiu distrikto ne estas eĉ pli granda, tion ĝi dankas ekskluzive al la rekrutado el la ĉirkaŭaj distriktoj kaj al miksaj geedz-iĝoj kun sanaj rasoj."

S-ro Charles Parsons, antaŭ mallonge ankoraŭ kuracisto de la sama malsanulejo, skribas en letero al la komisaro Longe i.a.:

„Mi povas paroli nur el persona observado, ne statistike, sed mi ne hezitas aserti ke mia indigno ree kaj ree ekfuriozis ĉe vido al tiuj kompatindaj infanoj, kies sano estis oferita por kontentigi la avidon de iliaj gepatroj kaj de la dungistoj."

Li nombras la kaŭzojn de la ceramikistaj malsanoj kaj finas ilin kulm-inante per „longaj laborhoroj". La komisiona raporto esperas ke

„manufakturo de tiom elstara pozicio en la okuloj de la mondo ne portos plu longe la hontindan makulon ke ĝia granda sukceso estas akompanata de korpa degenero, multbranĉaj korpaj suferoj kaj frua morto de la laborista loĝantaro, per kies laboro kaj lerteco atingiĝis tiom grandaj rezultoj."[101]

Kio veras pri la ceramikejoj en Anglio, veras pri tiuj en Skotlando.[102]

La manufakturo de alumetoj komenciĝis en 1833, ekde la invento meti la fosforon sur la fajrovergon mem. Ekde 1845 ĝi disvolviĝis rapide en Anglio kaj disvastiĝis al la dense loĝataj partoj de Londono, speciale ankaŭ al Manĉestro, Liverpulo, Bristolo, Norviĉo, Novkaselo, Glasgovo,

100„Public Health, 3rd Report etc.", p. 103, 105.

101„Children's Employm. Commission, 1863", p. 24, 22 kaj XI.

102l.c., p. XLVII.

kaj kun ĝi la makzelkramfo[103], kiun viena kuracisto jam 1845 malkovris kiel malsanon propran al alumetfaristoj. La duono de la laboristoj estas infanoj malpli ol 13-jaraj kaj junuloj sub 18 jaroj. La manufakturo estas pro sia malsanigeco kaj naŭzeco tiom fifama ke nur la plej mizera parto de la laborista klaso, duone malsatmortintaj vidvinoj ktp, donas infanojn por ĝi, kiuj estas „ĉifonaj, duone malsatmortintaj, komplete senprizorgaj kaj needukitaj infanoj".[104] El la atestantoj, kiujn la komisaro White (1863) aŭskultis, estis 270 malpli ol 18-jaraj, 40 malpli ol , 10-jaraj, 10 nur 8-jaraj kaj 5 nur 6-jaraj. Ŝanĝo de la labortago de 12 al 14 kaj al 15 horoj, noktlaboro, malregulaj manĝotempoj, plej ofte en la laborejoj mem, en haladzo de fosforo. Danto trovintus ke en tiu manufakturo liaj plej kruelaj infer-fantazioj estas superitaj.

En la tapetfabriko la pli krudaj specoj estas presataj per maŝino, la pli fajnaj permane. La plej viglaj afermonatoj okazas inter komenco de oktobro kaj fino de aprilo. Dum tiu periodo la laboro daŭras tre ofte kaj preskaŭ seninterrompe de la 6-a matene ĝis la 10-a vespere kaj pli profunde en la nokto.

J. Leach deklaris:

> „Lastan vintron [1862] el la 19 knabinoj 6 restis for pro malsanoj akiritaj per trolaborado. Por teni ilin maldormaj, mi devas alkriegi ilin." W. Duffy: „La infanoj ofte pro laceco ne povis teni la okulojn malfermitaj, fakte, eĉ ni mem apenaŭ povas tion." J. Lightbourne: „Mi havas 13 jarojn … Lastan vintron ni laboris ĝis la 9-a vespere kaj la antaŭan vintron ĝis la 10-a. Lastan vintron mi kutimis preskaŭ ĉiun vesperon plori pro doloro de vunditaj piedoj." G. Aspden: „Tiun mian filon, kiam li estis 7-jara, mi kutimis porti sur mia dorso super la neĝo alen kaj reen, kaj li kutimis labori dum 16 horoj! … Mi ofte genuis por nutri lin, kiam li staris ĉe la maŝino, ĉar li ne rajtis forlasi ĝin aŭ sidi senmove." Smith, la afergvidanta asociano de manĉestra fabriko: „Ni" (li celas siajn „manojn", kiuj por „ni") laboras sen interrompoj por manĝoj, tiel ke la taglaboro de 10½ horoj pretas je la 4 ½ posttagmeze, kaj ĉio cetero estas kromtempo."[105] (Ĉu tiu s-ro Smith eble ne prenis manĝaĵon dum la 10½ horoj?) „Ni" (la sama s-ro Smith) „malofte ĉesas antaŭ la 6-a vespere" (li

103 Faktermino: trismo. -vl

104 saml., LIV.

105 Tio ne kompreniĝas en nia senco de pluslabortempo. Tiuj sinjoroj konsideras la 10½-horan laboron kiel normalan labortagon, kiu do inkludas ankaŭ la normalan pluslaboron. Poste komenciĝas „la kromtempo", kiu estas iomete pli bone pagata. Oni vidos ĉe posta okazo ke la uzado de la laborforto dum la tiel nomata normaltago estas subvalore pagata, tiel ke la „kromtempo" estas nura kapitalista truko por elpremi pli da „pluslaboro", kio ĝi cetere restas eĉ tiam kiam la laborforto aplikata dum la „normaltago" estas vere plene pagata.

celas la konsumadon de „niaj” laborfortmaŝinoj), „tiel ke ni” (ree Crispinus) „efektive la tutan jaron laboras kromtempon … La infanoj kaj plenkreskuloj” (152 infanoj kaj junuloj malpli ol 18-jaraj kaj 140 plenkreskuloj) „laboris samritme dum la lastaj 18 monatoj mezume almenaŭ 7 tagojn kaj 5 horojn semajne aŭ 78 $^{1}/_{2}$ horojn semajne. Por la 6 semajnoj, kiuj finiĝis la 2-an de majo ĉi-jare” (1863), „la mezumo estis pli alta – 8 tagoj aŭ 84 horoj semajne!”

Sed la sama s-ro Smith, tiom ŝatanta la „majestan pluralon”[106], aldonas ridete: „Maŝinlaboro estas facila.” Kaj tiel diras la dungistoj pri manpresado: „Manlaboro estas pli sanfavora ol maŝinlaboro”. Ĝenerale la sinjoroj fabrikistoj esprimas sin kun indigno kontraŭ la propono „haltigi la maŝinon almenaŭ dum la manĝoj”.

„Leĝo”, diras s-ro Ottley, la manaĝero de tapetfabriko en Borough (en Londono), „kiu permesus laborhorojn de la 6-a matene ĝis la 9-a vespere, ja tre konvenus al ni (!), sed la horoj de la fabrikleĝo de la 7-a matene ĝis la 6-a vespere ne taŭgas al ni (!) … Nia maŝino estas dum la tagmanĝo” (kia larĝanimeco) „haltigita. La halto ne kaŭzas konsiderindan perdon je papero kaj farbo.” „Sed”, aldonas li simpatie, „mi povas kompreni ke la perdo ligita kun ĝi ne estas ŝatata.”

La komisiona raporto opinias naive ke la timo de kelkaj „gvidaj firmaoj perdi” tempon, t.e. tempon por alproprigo de fremda laboro kaj per tio „profiton”, ne estas „sufiĉa kialo perdigi” la tagmanĝon al infanoj malpli ol 13-jaraj kaj al junuloj sub 18 jaroj dum 12 ĝis 16 horoj aŭ aldoni ĝin al ili, kiel oni aldonas al la vapormaŝino karbon kaj akvon, al la lano sapon, al la rado oleon ktp – dum la produktadprocezo mem, kiel nuran helpmaterialon de la laborrimedo.[107]

Neniu industribranĉo en Anglio – ni ne konsideru la nur lastatempe enkondukitan panfaradon per maŝinoj – konservis ĝis hodiaŭ tiom antikvecan, eĉ, kiel videblas ĉe la poetoj de la romia imperiestra tempo, antaŭkristanisman produktadmanieron kiom la bakado. Sed la kapitalo, kiel ni rimarkigis antaŭe, estas unue indiferenta pri la teĥnika karaktero de la laborprocezo kiun ĝi submetas al si. Ĝi prenas ĝin unue tia, kia ĝi trovas ĝin.

La nekredebla panfalsado, speciale en Londono, estis unue rivelita de la komitato de la ĉambro de deputitoj „pri la falsado de nutraĵoj” (1855-1856) kaj de la skribaĵo de D-ro Hassall „Adulterations detected”.[108] La

106 T. e. uzante la „ni” celante siajn subulojn. -vl

107 l.c., Appendix, p. 123, 124, 125, 140 kaj LXIV.

108 Aluno, fajnfrotita aŭ miksita kun salo, estas normala komerca artiklo, kun la karakteriza nomo „baker's stuff” <bakistaĵo>.

sekvo de tiuj riveloj estis la leĝo de la 6-a de aŭgusto 1860: „por antaŭmalhelpi falsadon de nutraĵoj kaj trinkaĵoj”, leĝo senefika, ĉar ĝi traktas kompreneble kun plej granda delikateco ĉian liberkomerciston kiu intencas, per aĉeto kaj vendo de falsitaj varoj, „to turn an honest penny” <gajni honestan pencon>.[109] La komitato formulas pli aŭ malpli naive sian konvinkon ke liberkomerco signifas esence la komercon per falsitaj aŭ, kiel la anglo sprite nomas tion, „sofistikitaj materialoj”. Efektive tian „sofistikon” ĝi mastras pli bone ol Pitagoro, fari el nigro blankon kaj el blanko nigron, kaj pli bone ol la eleŭzisanoj, pruvi la nuran ŝajnon de ĉio reala.[110]

Ĉiukaze la komitato direktis la okulojn de la publiko al sia „ĉiutaga pano” kaj do al la bakado. Samtempe sonis en publikaj kunvenoj kaj peticioj al la parlamento la kriego de la londonaj bakist-submajstroj pro trolaboro ktp. La kriego fariĝis tiom urĝa ke s-ro H. S. Tremenheere, ankaŭ membro de la plurfoje menciita komisiono de 1863, estis nomumita reĝa enketkomisaro. Lia raporto[111], kune kun deklaroj de atestantoj, furiozigis la publikon, ne lian koron, sed lian stomakon. La bibli-sperta anglo ja sciis, ke la homo, se li ne estas pro dia graco kapitalisto aŭ grundlordo aŭ sinekurulo, estas alvokita manĝi sian panon je la ŝvito de sia frunto, sed li ne sciis ke li devas manĝi en sia pano ĉiutage certan kvanton da homŝvito, trempita de elpremitaĵoj de pustuloj, de araneaĵo, de blatkadavroj kaj de putra germana gisto, por ne paroli pri aluno, sabloŝtono kaj ceteraj agrablaj mineralaj ingrediencoj. Sen ajna respekto al la sankta moŝto, la liberkomerco, oni do submetis la ĝis tiam „liberan” bakadon al la kontrolado de la ŝtatinspektistoj (fino de la parlamenta sesio

109 Fulgo estas konata kiel tre energia formo de karbono kaj uzata kiel sterkaĵo kiun kapitalistaj kamenpurigistoj vendas al anglaj farmistoj. En la jaro 1862 brita ĵurio devis decidi en proceso ĉu fulgo, al kiu sen scio de la aĉetanto estas miksita 90 % da polvo kaj sablo, estas „reala” fulgo en „komerca” senco aŭ „falsita” fulgo en „leĝa” senco. La amikoj de komerco decidis, ke tio estas „reala” fulgo kaj rifuzis la plendon de la farmisto kiu devis krome pagi la proceskostojn.

110 La franca ĥemiisto Chevallier, en traktaĵo pri la falsadoj de la varoj, nombras inter pli ol 600 artikloj kiujn li prezentas, por multaj el ili 10, 20, 30 diversajn metodojn de falsado. Li aldonas ke li ne konas ĉiujn metodojn kaj ke li ne mencias ĉiujn kiujn li konas. Por sukero li donas 6 falsadmetodojn, 9 por olivoleo, 10 por butero, 12 por salo, 19 por lakto, 20 por pano, 23 por brando, 24 por faruno, 28 por ĉokolado, 30 por vino, 32 por kafo ktp. Eĉ la plejpotenca dio ne eskapas tiun sorton. Vd Rouard de Card, „De la falsification des substances sacramentelles”, Parizo, 1856.

111 „Report etc. relating to the Grievances complained of by the Jorneymen Bakers etc.”, Londono, 1862, kaj „Second Report etc.”, Londono, 1863.

1863) kaj per la sama parlamenta decido malpermesis la labortempon de la 9-a horo vespere ĝis la 5-a matene por bakist-submajstroj malpli ol 18-jaraj. La lasta klaŭzo diras multon pri la trolaboro en tiu tradicia, ŝajne hejmeca komerca branĉo.

> „La laboro de londona bakist-submajstro komenciĝas ĝenerale je la 11-a horo nokte. En tiu horo li faras la paston, tre pena procezo, kiu daŭras duonan ĝis tri-kvaronan horon, laŭ la grando de la bakaĵo kaj laŭ ĝia fajneco. Tiam li kuŝigas sin sur la knedbreto, kiu servas samtempe kiel kovrilo de la trogo en kiu la pasto fariĝas, kaj dormas kelkajn horojn kun farunsako sub la kapo kaj alia farunsako sur la korpo. Poste ekas rapida kaj seninterrompa laboro de 5 horoj, ĵetado de la pasto, ĝia pesado, formado, enŝovo en la fornon, preno el la forno ktp. La temperaturo de bakejo estas de 75 ĝis 90 gradoj <Farenhejto> kaj en la malgrandaj bakejoj plej ofte pli ol malpli. Kiam la farado de pano, bulko ktp plenumiĝis, komenciĝas la disdonado de la pano; kaj konsiderinda parto de la tagsalajruloj, post plenumi la supre priskribitan noktlaboron, dum la tago portas la panon en korboj, aŭ ŝovas ĝin per ĉaretoj de domo al domo kaj intertempe ankaŭ agas en la bakejo. Laŭ la sezono kaj la amplekso de la komerco la laboro finiĝas inter la 1-a kaj la 6-a posttagmeze, dum alia parto de la submajstroj agas ĝis malfrue en la posttagmezo en la bakejo.”[112] „Dum la londona sezono la submajstroj de la bakistoj je «plenaj» panprezoj en *Westend* komencas labori regule je la 11-a horo nokte kaj estas okupataj de panfarado, interrompite de unu aŭ du ofte tre mallongaj paŭzoj, ĝis la 8-a horo de la sekva mateno. Ili estas poste eluzataj ĝis la 4-a, 5-a, 6-a, eĉ 7-a horo por disportado de pano aŭ kelkfoje por biskvitbakado en la bakejo. Post farita laboro ili ĝuas dormon de 6, ofte nur de 5 aŭ 4 horoj. Vendrede la laboro komenciĝas ĉiam pli frue, ekz-e je la 10-a horo vespere, kaj daŭras seninterrompe, ĉu per bakado, ĉu per kolportado de la pano, ĝis la 8-a horo de la sekvanta sabatvespero, sed plej ofte ĝis la 4-a aŭ 5-a horo de la nokto de dimanĉo. Ankaŭ en la luksaj bakejoj, kiuj vendas la panon je «plena prezo», oni devas dimanĉe ree fari 4 ĝis 5 horojn da prepara laboro por la venonta tago … La bakistaj submajstroj de la «underselling masters»” (kiuj vendas la panon sub la plena prezo), „kaj tiuj estas, kiel antaŭe menciite, pli ol $^{3}/_{4}$ de la londonaj bakistoj, havas ankoraŭ pli longajn laborhorojn, sed ilia laboro estas tute limigita al la bakejo, ĉar iliaj majstroj, escepte de liverado al malgrandaj vendejoj, vendas nur en la propra butiko. Proksime de la semajnfino … t.e. ĵaŭde, la laboro komenciĝas ĉi tie je la 10-a horo nokte kaj daŭras kun nur eta interrompo ĝis profunde en la dimanĉan nokton.”[113]

Eĉ el burĝa vidpunkto kompreniĝas pri la „underselling masters” ke „la nepagata laboro de la submajstroj fariĝis la bazo de ilia konkurenco.”[114]

---

112 l.c., „First Report etc.”, p. VI/VII.

113 l.c., p. LXXI.

114 George Read, „The History of Baking”, Londono, 1848, p. 16.

Kaj la „full priced baker” denuncas siajn „underselling” konkurantojn ĉe la esplorkomisiono kiel ŝtelistojn de fremda laboro kaj kiel falsistojn.

> „Ili sukcesas nur per trompado de la publiko kaj per tio ke ili eltiras 18 horojn el siaj submastroj por salajro de 12 horoj.”[115]

La panfalsado kaj la estiĝo de bakista klaso kiu vendas la panon sub la plena prezo disvolviĝis en Anglio ekde la 18-a jarcento, tuj kiam la korporacia karaktero de la metio perdiĝis kaj la kapitalisto en la formo de muelisto aŭ farunkomercisto aperis malantaŭ la nominala bakistmajstro.[116] Per tio estiĝis la bazo de la kapitalisma produktado, de senmezura longigo de la labortago kaj de noktlaboro, kvankam tiu lasta serioze enkondukiĝis en Londono nur en 1824.[117]

Laŭ la supra dirito kompreneblas ke la komisiona raporto kalkulas la bakistajn submajstrojn al la mallongvivaj laboristoj kiuj, post feliĉe eskapi la infan-decimadon normalan por ĉiuj partoj de la laborista klaso, malofte atingis la 42-an vivjaron. Tamen la bakista metio estas ĉiam superplena de kandidatoj. La provizaj fontoj de tiuj „laborfortoj” por Londono estas Skotlando, la okcidentaj kampkulturaj distriktoj de Anglio kaj – Germanio.

En la jaroj 1858-1860 la bakistaj submajstroj organizis en Irlando proprakoste grandajn publikajn renkontiĝojn por agitado kontraŭ la nokt- kaj dimanĉ-laboro. La publiko, ekz-e ĉe la publika renkontiĝo en Dublino, en majo 1860, apogis ilin kun ireca varmo. Kiel rezulto de tiu movado, ekskluziva taglaboro estis sukcese trudita en Wexford, Kilkenny, Clonmel, Waterford ktp.

> „En Limeriko, kie estis konate ke la turmentoj de la salajro-submastroj superis ĉian mezuron, tiu movado malsukcesis pro la kontraŭstaro de la bakistaj majstroj, speciale de la bakistoj-muelistoj. La ekzemplo de Limeriko kondukis al malprogreso en Ennis kaj Tipperary. En Cork, kie la publika indigno manifestiĝis plej vigle, la majstroj vanigis la movadon per uzo de sia povo

115 „Report (First) etc. Evidence.” Deklaro de la „full priced baker”, Cheesman, p. 108.

116 George Read, saml. Fine de la 17-a kaj komence de la 18-a jarcento la agentoj penetrantaj en ĉiujn eblajn metiojn estis ankoraŭ publike denuncataj kiel „publikaj ĝenantoj”. Tiel ekz-e la Grand Jury decidis, dum la kvaronjare okazanta sesio de pacjuĝistoj en la graflando Somerset, memoraĵon al la ĉambro de deputitoj, en kiu tekstas i.a.: „ke tiuj agentoj de Blackwell Hall estas publika ĝeno kaj malutilas al la tukmetio kaj devus esti subpremataj kiel malutiluloj”. („The Case of our English Wool etc.”, Londono, 1685, p. 6, 7.

117 „First Report etc.”, p. VIII.

maldungi la submajstrojn. En Dublino la majstroj plej decide kontraŭstaris kaj, per persekutado de la submajstroj kiuj staris ĉe la pinto de la agitado, devigis la reston cedi kaj akcepti la nokt- kaj dimanĉ-laboron, kontraŭan al la konvinkoj de la homoj[118]."[119]

La komisiono de la angla registaro – registaro kiu, en Irlando, estas ĝisdente armita kaj ĝenerale scias kiel montri tion[120] – riproĉas en milda, kvankam funebra tono la senkompatajn bakist-majstrojn de Dublino, Limeriko, Cork ktp:

„La Komitato kredas ke la laborhoroj estas limigitaj de naturaj leĝoj kiujn oni ne povas rompi senpune. Per tio ke la majstroj minacis forpeli ilin, devigas siajn laboristojn rompi sian religian konvinkon, malobei la landan leĝon kaj malrespekti la publikan opinion" (tiu lasta koncernas tute la dimanĉlaboron), „ili kaŭzas malbonan rilaton inter kapitalo kaj laboro kaj donas ekzemplon danĝeran por religio, moralo kaj publika ordo … La Komitato kredas ke la longigo de la labortago trans 12 horoj estas uzurpa entrudiĝo en la hejman kaj privatan vivon de la laboristo kaj kondukas al katastrofaj moralaj rezultoj, per konfliktiĝo kun la hejma vivo de ĉiu viro kaj kun la plenumado de liaj familiaj devoj kiel filo, frato, edzo kaj patro. Laboro pli ol 12-hora tendencas subfosi la sanon de la laboristo, kondukas al antaŭtempa maljuniĝo kaj frua morto kaj pro tio al malfeliĉo de la laboristaj familioj senigitaj je la antaŭzorgo kaj apogo de la familiestro ĝuste en la plej bezonata momento".[121]

Ni estis ĵus en Irlando. Aliflanke de la kanalo, en Skotlando, la kamp-laboristo, la plugisto, denuncas sian 13- ĝis 14-horan laboron, en plej malmilda klimato, kun kvarhora kroma laboro dimanĉe (en tiu lando de la sabatistoj!)[122], dum antaŭ londona Granda Tribunalo (Grand Jury) staras

118 „kontraŭan al la konvinkoj de la homoj" laŭ la angla eldono. -vl

119 „Report of Committee on the Baking Trade in Ireland for 1861."

120 la teksto inter streketoj laŭ la angla eldono. -vl

121 Saml.

122 Publika kunveno de la kampkulturaj laboristoj en Lasswade, ĉe Glasgovo, de la 5-a de januaro 1866. (Vidu „Workman's Advocate" de la 13-a de januaro 1866) La starigo, ekde fine de 1865, de sindikato inter la kampkulturaj laboristoj, unue en Skotlando, estas historia evento. En unu el la plej subpremataj kampkulturaj distriktoj de Anglio, en Buckinghamshire, la dung-laboristoj faris en marto 1867 grandan strikon por altigi la semajnsalajron de 9-10 ŝ. al 12 ŝ. – (Oni vidas el la dirito ke la movado de la angla kampkultura proletaro, tute rompita post la subpremado de ties perfortaj manifestacioj post 1830 kaj speciale ekde la enkonduko de la nova malriĉulleĝo, rekomenciĝas en la sesdekaj jaroj, ĝis kiam ĝi fine en 1872 fariĝas ekpokfara. Mi revenos al tio en la 2-a volumo, same kiel al la blulibroj aperintaj ekde 1867 pri la situacio de la angla kamplaboristo. Aldono al la 3-a eld.)

samtempe tri fervojlaboristoj, personkondukisto, lokomotivkondukisto kaj signalisto. Granda fervojakcidento sendis centojn da pasaĝeroj en la alian mondon. La neglektemo de la fervojlaboristoj estas la kaŭzo de la akcidento. Ili deklaras antaŭ la ĵurianoj unuanime, ke antaŭ 10 ĝis 12 jaroj ilia laboro daŭris nur 8 horojn tage. Dum la lastaj 5 ĝis 6 jaroj oni longigis ĝin al 14, 18 kaj 20 horoj, kaj speciale ĉe aparte vigla alveno de vojaĝemuloj, kiel en la periodoj de ekskursaj trajnoj, ĝi daŭras ofte seninterrompe 40 ĝis 50 horojn. Ke ili estas ordinaraj homoj kaj ne ciklopoj. Ke ĉe donita punkto ilia laborforto ne funkcias. Ke torporo kaptas ilin. Ke ilia cerbo ĉesas pensi kaj ilia okulo vidi. La tute respektinda brita ĵuriano respondas per verdikto kiu sendas ilin pro hommortigo („manslaughter") antaŭ la asizojn kaj esprimas en milda anekso la pian deziron ke la sinjoroj kapitalmagnatoj de la fervojo estu estonte pli malŝparemaj ĉe la aĉeto de la necesa kvanto da „laborfortoj" kaj „pli sindetenemaj" aŭ „pli abstinemaj" aŭ „pli ŝparemaj" ĉe elsuĉado de la pagita laborforto.[123]

El la multspeca amaso de laboristoj de ĉiuj profesioj, aĝoj, seksoj, kiuj pli multnombre premiĝas antaŭ ni ol la animoj de la mortintoj antaŭ Odiseo en la infero, kaj ĉe kiuj, sen malfermi la blulibrojn kiujn ili portas sub la brako, oni tuj unuavide rekonas la spurojn de la ekscesa laboro, ni prenu ankoraŭ preterpase du figurojn kies frapa kontrasto pruvas ke antaŭ la kapitalo ĉiuj homoj egalas – modistinon kaj forĝiston.

En la lastaj semajnoj de junio 1863 ĉiuj londonaj taggazetoj havis paragrafon kun la „sensacia" titolo „Morto pro simpla trolaboro". Temis

123„Reynold's Paper", [21-a de ] jan. 1866. Semajnon post semajno la sama semajngazeto raportas tuj sinsekve, sub la sensaciaj titoloj: „Teruraj kaj mortigaj akcidentoj", „hororaj tragedioj" ktp, tutan liston de novaj fervojkatastrofoj. Al tio respondas laboristo de la trajnlinio North Stafford: „Ĉiu konas la sekvojn kiam la atento de lokomotivkondukisto kaj hejtisto por momento malvigliĝas. Kaj kiel eblas alie ĉe senmezura longigo de la laboro, en plej malmilda vetero, sen paŭzo kaj ripozo? Prenu kiel ekzemplon por tio kio okazas ĉiutage la sekvan kazon. Lastan lundon hejtisto komencis tre frumatene sian taglaboron. Li finis ĝin post 14 horoj 50 minutoj. Antaŭ ol li havis la tempon trinki sian teon, oni vokis lin denove al la laboro. Li devis do tralabori seninterrompe 29 horojn 15 minutojn. La resto de lia semajnlaboro estis jena: merkrede 15 horoj 35 minutoj; vendredo $14^1/_2$ horoj; sabate 14 horoj 10 minutoj; sume por la semajno 88 horoj 14 minutoj. Kaj nun pensu lian miron, kiam li ricevis pagon por nur 6 labortagoj. La homo estis novulo kaj demandis kion oni komprenas sub taglaboro. Respondo: 13 horojn, do 78 horojn semajne. Sed kiom pri la pago por la kromaj 10 horoj 30 minutoj? Post longa disputo li ricevis kompensaĵon de 10 d." (eĉ ne 10 arĝentaj ĝroŝoj). (l.c., n-ro de la 4-a de februaro 1866)

pri la morto de inĉapelistino Mary Anne Walkley, dudekjara, dungita en tre respektinda firmao liveranto de la reĝa kortego kaj kiun ekspluatis sinjorino kun la milda nomo Elise. La malnova ofte rakontata historio estis nun denove malkovrita[124], ke tiuj knabinoj laboras mezume 16¹/₂ horojn, sed dum la sezono ofte 30 horojn seninterrompe, per tio ke ilia malfortiĝanta „laborforto” estis fluigita per okaza aldono de ŝerio, portvino aŭ kafo. Kaj estis ĝuste la kulmino de la sezono. Necesis sorĉe finpretigi la luksajn robojn de nobelaj sinjorinoj por la honorbalo por la nove importita Princino de Kimrio. Mary Anne Walkley estis laborinta senpaŭze dum 26¹/₂ horoj, kun 60 aliaj knabinoj, 30 en unu salono kiu donis apenaŭ triononde la necesaj kubikcoloj da aero, dum ili nokte dividis duope unu el tiuj sufokaj truoj en kiujn la dormejo estis dividita per vandoj el plankoj.[125] Kaj tiu estis unu el la plej bonaj inĉapelaj entreprenoj de Londono. Mary Anne Walkley malsaniĝis vendrede kaj mortis dimanĉe, sen, je la miro de s-ino Elise, eĉ finpretigi sian taskon. La kuracisto, vokita tro malfrue al la mortlito, atestis antaŭ la nekropsi-komisiono per sekaj vortoj:

> „Mary Anne Walkley mortis pro longaj laborhoroj en superŝarĝita laborĉambro kaj tro malvasta, malbone ventumata dormejo.”

124 Kp F. Engels, l.c., p. 253, 254. <Vd vol. 2, p. 426, 427>

125 D-ro Letheby, kuracisto dungita ĉe *Board of Health*, deklaris tiam …

> „La minimumo da aero necesa por plenkreskulo en dormĉambro estas tricent kubaj piedoj, kaj en loĝĉambro kvincent.” D-ro Richardson, ĉefkuracisto de malsanulejo en Londono, diris: „La ĉiuspecaj kudristinoj, inĉapelistinoj, robtajlorinoj ktp estas frapataj de tri plagoj: laboreksceso, aermanko kaj manko de nutraĵoj aŭ manko de digesto. Ĝenerale, tiu speco de laboro taŭgas ĉiukaze pli por virinoj ol por viroj. Sed la malfeliĉo por la metio, ĉefe en Londono, estas ke ĝi estis monopoligita de dudek ses kapitalistoj kiuj, per perfortaj rimedoj fontantaj el la kapitalo, eldevigas ŝparadon de elspezoj per malŝparado de la laborforto. Ilia potenco estas sentata de la laboristinoj en ĉiuj branĉoj de kudrado. Se robtajlorino ekz-e povas akiri etan rondon da klientoj, la konkurenco devigas ŝin hejme pereigi sin per laborego por konservi ĝin, kaj la saman laboreksceson ŝi devas trudi al siaj helpantinoj. Se ŝia afero fiaskas aŭ se ŝi ne sukcesas establi sin sendepende, tiam ŝi turnas sin al establo kie la laboro ne estas pli malmulta, sed la pago pli sekura. En tia kondiĉo ŝi fariĝas vera sklavino, puŝata de la fluktuadoj de la socio; jen hejme en ĉambreto malsatmortanta, aŭ preskaŭ; jen el la 24 horoj okupata 15, 16, eĉ 18 horojn en apenaŭ eltenebla aero kaj kun nutraĵo kiu, eĉ se bona, pro foresto de pura aero ne digesteblas. De tiuj viktimoj vivas la ftizo, kiu ne estas io alia ol aermalsano.” (Dr. Richardson, „Work and Overwork”, en „Social Science Review”, 18-a de julio 1863)

Por doni al la kuracisto lecionon pri bona vivarto, la komisiono pri nekropsio deklaris male:

> „La forpasintino mortis pro apopleksio, sed ekzistas kaŭzo por timi, ke ŝia morto estis akcelita de laboreksceso en superŝarĝita laborejo ktp."

„Niaj blankaj sklavoj", kriis la Morning Star, la organo de la liberkomercistaj sinjoroj Cobden kaj Bright, „niaj blankaj sklavoj estas laborigataj entomben kaj pereas kaj silente mortas".[126]

> „Labori ĝismorte estas la tagordo, ne nur en la laborejo de la inĉapelistinoj, sed en mil lokoj, eĉ ĉiuloke kie prosperigaj aferoj farendas … Ni prenu la forĝiston kiel ekzemplon. Se kredi la poetojn, ne ekzistas alia tiom vivforta, gaja viro ol la forĝisto. Li leviĝas frue kaj ŝprucas fajrerojn antaŭ la suno, li manĝas kaj trinkas kaj dormas kiel neniu alia viro. El pure korpa vidpunkto li troviĝas, ĉe modera laboro, efektive en unu el la plej bonaj homaj pozicioj. Sed ni sekvu lin en la urbon kaj rigardu la laborpezon kiu estas ŝarĝita sur la fortulon, kaj kian rangon li okupas en la listo de mortokvoto de sia lando. En Marylebone" (unu el la plej grandaj kvartaloj de Londono) „forĝistoj mortas en proporcio de jare 31 elmiloj, aŭ 11 super la mezuma mortkvoto de plenkreskaj viroj en Anglio. Tiu okupiĝo, preskaŭ instinkta arto de la homaro, senriproĉa kiel branĉo de homa laboro, fariĝas per nura troigo de la laboro detruanto de la viro. Li povas ĉiutage fari tiom da martelfrapoj, fari tiom da paŝoj, spiri tiom da fojoj, fari tiom da laboro kaj vivi mezume kvindek jarojn. Oni devigas lin fari dum la tago tiom da martelfrapoj pli, tiom da paŝoj pli, spiri tiom da fojojn pli kaj sume pliigi je kvarono sian ĉiutagan vivelspezon. Li provas tion, kaj la rezulto estas ke li por limigita periodo plenumas kvar-

126 *Morning Star*, 23-a de junio 1863. La *Times* uzis tiun eventon por defendi la usonajn sklavistojn kontraŭ Bright ktp. „Tre multaj inter ni", diris ĝi, „opinias ke, tiom longe kiom ni laborigas ĝismorte niajn proprajn junulinojn per la skurĝo de malsato anstataŭ per la knalo de vipo, ni ne vere havas la rajton fulmi kontraŭ familioj kiuj naskiĝis sklavistoj kaj almenaŭ bone nutras siajn sklavojn kaj laborigas ilin modere." (*Times*, 2-a de julio 1863). La *Standard*, organo de la Tory [konservativuloj -vl], sammaniere riproĉis la pastron Newman Hall: „Vi ekskomunikas la sklavistojn, sed preĝas kun la bravuloj kiuj sen konsciencriproĉoj laborigas la ĉaristojn kaj busŝoforojn de Londono ktp dum dek ses horoj tage kaj por mizera salajro." Fine parolis la orakolo, s-ro Thomas Carlyle, pri kiu mi jam 1850 skribis: „La genio iris al la diablo, sed la kulto restis." En mallonga parabolo li reduktas la unike grandiozan eventon de la nuna epoko, la usonan internan militon, al tio ke la norda Petro volis nepre frakasi la kranion de la suda Paŭlo, ĉar la norda Petro „luas" sian laboriston „ĉiutage" kaj la suda Paŭlo „por la vivo". (*Macmillan's Magazine. Ilias Americana in nuce* (aŭgusta kajero 1863) Tiel fine krevis la ŝaŭmveziko de simpatio de la konservativuloj por la urba – tute ne por la kampara! – dunglaboristo. La kerno nomiĝas – sklavismo!

onon pli da laboro kaj mortas en sia 37-a jaro anstataŭ en la 50-a."[127]

## 4. Tag- kaj nokt-laboro. La alternadsistemo

La konstanta kapitalo, la produktadrimedoj, ekzistas, el vidpunkto de la plivalorigprocezo, nur por ensuĉi laboron kaj kun ĉiu guto da laboro proporcian kvanton da pluslaboro. Dum ili ne faras tion, ilia nura ekzistado estigas negativan perdon por la kapitalisto, ĉar ili reprezentas dum la tempo en kiu ili stagnas senutilan antaŭpagon de kapitalo, kaj tiu perdo fariĝas pozitiva, ekde kiam la interrompo trudas kromajn elspezojn por la rekomenco de la laboro. La longigo de la labortago trans la limojn de la natura tago en la nokton efikas nur kiel paliativo, nur proksimume kontentigas la vampiran soifon je viva laborsango. Alpropriĝi laboron dum ĉiuj 24 horoj de la tago estas do la imanenta instinkto de la kapitalisma produktado. Sed ĉar tio korpe ne eblas, se la samaj laborfortoj estus tage kaj nokte senĉese elsuĉataj, tial necesas, por superi tiun korpan baron, alternado inter la tage kaj nokte konsumataj laborfortoj, alternado kiu allasas diversajn metodojn, ekz-e ordigeblas tiel ke parto de la laborantoj faras dum unu semajno tagan servon kaj la alian semajnon noktan servon ktp. Oni scias, ke tiu alterna sistemo, tiu alterna mastrumado, antaŭregis en la plena junecperiodo de la angla kotonindustrio ktp kaj intertempe floras en la kotonŝpinejoj de la gubernio Moskvo. Kiel sistemo tiu 24-hora produktadprocezo ekzitas ankoraŭ hodiaŭ en multaj ĝis nun „liberaj" industribranĉoj de Britio, i.a. ĉe la altfornoj, forĝejoj, laminejoj kaj aliaj metalmanufakturoj de Anglio, Kimrio kaj Skotlando. La laborprocezo entenas tie krom la 24 horojn de la 6 labortagoj grandparte ankaŭ la 24 horojn de dimanĉo. La laboristoj konsistas el viroj kaj virinoj, plenkreskuloj kaj infanoj ambaŭseksaj. La aĝo de la infanoj kaj junuloj entenas ĉiujn jarojn ekde la oka vivjaro (en kelkaj kazoj ekde la 6-a) ĝis la 18-a jaro.[128] En kelkaj branĉoj ankaŭ knabinoj kaj virinoj laboras nokte kune kun la vira personaro.[129]

---

127 Dr. Richardson, saml.

128 „Children's Employment Commission. Third Report", Londono, 1864, p. IV, V, VI.

129 „En Staffordshire kiel ankaŭ en Sud-Kimrio junaj knabinoj kaj virinoj estas dungitaj en karbminejoj kaj koaksaj ŝutmontoj, ne nur tage, sed ankaŭ nokte. En la raportoj submetitaj al la parlamento tio estis ofte menciata kiel praktiko ligita kun grandaj kaj konataj malbonaĵoj. Tiuj virinoj kunlaborantaj kun la viroj kaj kiuj apenaŭ distingiĝas per sia vestaĵo de tiuj, makulitaj de koto kaj fumo, estas elmetitaj al karaktera dekadenco, ĉar ili perdas sian memestimon,

Sendepende de la ĝenerale malutilaj efikoj de noktlaboro,[130] la seninterrompa dudekkvarhora daŭro de la produktadprocezo donas plej bonvenan okazon trarompi la limon de la nominala labortago. Ekz-e en la antaŭe menciitaj, tre fortostreĉigaj industribranĉoj la oficiala labortago estas por ĉiu laboristo plej ofte 12 horoj, noktaj aŭ tagaj horoj. Sed la kromlaboro trans tiu limo estas en multaj kazoj, por uzi la vortojn de la angla oficiala raporto, „vere timiga" („truly fearful").[131]

> „Neniu homa menso", daŭrigas la raporto, „povas pripensi la laborkvanton, kiun laŭ la atest-deklaroj knaboj de 9- ĝis 12-jaraj plenumas, sen nerezisteble konkludi ke tia potencmisuzo de la gepatroj kaj de la dungistoj devas esti ne plu permesata."[132]

> „La metodo entute laborigi knabojn alterne tage kaj nokte kondukas, same dum urĝaj aferoj kiel dum la kutima okaziĝo de la aferoj, al honta longigo de la labortago. Tiu longigo estas en multaj kazoj ne nur kruela, sed eĉ nekredebla. Ne povas manki ke pro iu aŭ alia kaŭzo alternonta knabo ie kaj tie ne venas. Unu aŭ pluraj de la ĉeestantaj knaboj, kiuj jam plenumis sian

---

kio estas la preskaŭ neevitebla sekvo de ilia malvirina okupado." (l.c., 194, p. XXVI. Kp „Fourth Report" (1865) 61, p. XIII) Same en la vitrofabrikoj.

130 „Ŝajnas nature", rimarkigas ŝtalfabrikisto, kiu uzas infanojn por noktlaboro, „ke la knaboj, kiuj laboras nokte, ne povas dormi tage kaj trovi decan trankvilon, sed senĉese kuras." (l.c., Fourth Report, 63, p. xiii) Pri la graveco de sunlumo por konserviĝo kaj disvolviĝo de la korpo, kuracisto rimarkigas i.a.: „Lumo efikas ankaŭ rekte sur la histoj de la korpo, al kiuj ĝi donas rigidecon kaj elastecon. La muskoloj de animaloj, al kiuj oni malhavigas la normalan kvanton da lumo, fariĝas spongecaj kaj malelastaj, la nerva forto perdas sian tonuson per manko de stimulado, kaj la elfariĝo de ĉio entenata en kresko malfortiĝas … En la kazo de infanoj, la konstanta aliro de abunda taglumo kaj de rektaj sunradioj dum parto de la tago estas plej esenca por la sano. Lumo helpas prilabori la nutraĵojn al plasta sango kaj malmoligas la fibron post kiam ĝi estiĝis. Ĝi efikas same kiel incitilo por la vidorganoj kaj kaŭzas per tio pli grandan aktivecon en diversaj cerbaj funkcioj." S-ro W. Strange, ĉefkuracisto de la Ĝenerala Malsanulejo de Worcester, el kies verko pri „Sano" (1864) tiu tekstero estas pruntita, skribas en letero al unu el la esplorkomisaroj, s-ro White: „Mi havis antaŭe en Lancashire la okazon observi la efikojn de noktlaboro sur fabrikinfanoj, kaj mi ne hezitas diri ke, kontraste al la asertoj pri kiuj kelkaj dungistoj fieras, tiuj infanoj kiuj estis submetitaj al ĝi, baldaŭ suferis je sia sano." (l.c., 284, p. 55) [Vortumo de la lasta citaĵo el la angla originalo. -vl] La fakto, ke tiaj aferoj entute fariĝas temo de seriozaj disputoj, plej bone montras kiel la kapitalisma produktado efikas sur la „cerbaj funkcioj" de la kapitalistoj kaj de ties vasaloj.

131 l.c., 57, p. XII.

132 l.c., („4th Rep.", 1865), 58, p. XII.

labortagon, devas tiam kompensi la mankon. Tiu sistemo estas tiom ĝenerale konata ke la manaĝero de laminejo al mia demando, kiel la loko de la forestanta alternonta knabo pleniĝas, respondis: Mi ja scias ke vi scias tion same bone kiel mi, kaj li ne hezitis konfesi la fakton."[133]

„En laminejo, kie la nominala labortago daŭris de la 6-a matene ĝis la 5-a kaj duono vespere, knabo laboris dum 4 noktoj ĉiusemajne ĝis almenaŭ la 8-a kaj duono vespere de la sekva tago … kaj tion dum 6 monatoj." „Alia laboris en la aĝo de 9 jaroj kelkfoje dum tri sinsekvaj dekduhoraj laborskipoj kaj en la aĝo de 10 jaroj du tagojn kaj du noktojn sinsekve." „Tria, nun 10-jara, laboris de la 6-a matene ĝis la 12-a nokte tra tri noktoj kaj ĝis la 9-a vespere dum la aliaj noktoj." „Kvara, nun 13-jara, laboris de la 6-a posttagmeze ĝis la alia tago la 12-a tagmeze dum tuta semajno, kaj kelkfoje tri skipojn sinsekve, ekz-e de lundo matene ĝis mardo nokte." „Kvina, nun 12-jara, laboris en fergisejo en Stavely de la 6-a matene ĝis la 12-a nokte dum 14 tagoj, estas nekapabla fari tion plu." George Allinsworth, naŭjara: „Mi venis ĉi tien lastan vendredon. Sekvatage ni devis komenci je la 3-a matene. Mi restis do la tutan nokton ĉi tie. Mi loĝas 5 mejlojn de ĉi tie. Mi dormis sur la planko de la altforno kun antaŭtuko sub mi kaj jaketo sur mi. La du aliajn tagojn mi estis ĉi tie je la 6-a matene. Ho! Ĉi tie vere varmegas! Antaŭ ol veni ĉi tien, mi laboris ankaŭ dum preskaŭ tuta jaro en altfornejo, en la kamparo. Mi komencis ankaŭ sabatmatene je la 3-a, sed mi povis almenaŭ iri hejmen por dormi, ĉar tio estis proksima. En aliaj tagoj mi komencis matene je la 6-a kaj finis je la 6-a aŭ la 7-a vespere" ktp.[134]

---

133 saml.

134 l.c., p. XIII. La klerecnivelo de tiuj „laborfortoj" devas kompreneble estis tia kia ĝi aperas en la sekvaj dialogoj kun unu el la esplorkomisaroj! Jeremiah Haynes, 12-jara: „… Kvaroble kvar estas ok, sed kvar kvaroj estas 16 … Reĝo estas al li kiu havas ĉian monon kaj oron. Ni havas reĝon, oni diras ke li estas reĝino, ili nomas ŝin Princino Aleksandra. Oni diras ŝi edzigis la filon de la reĝino. Princino estas viro." Wm. Turner, dekdujara: „Mi ne vivas en Anglio. Mi pensas ke ekzistas tia lando, ne sciis pri tio antaŭe." John Morris, dekkvarjara: „Mi aŭdis diri ke Dio faris la mondon kaj ke la tuta popolo dronis, escepte de unu; aŭdis ke tiu unu estis birdeto." William Smith, dekkvinjara: „Dio faris la viron; la viro faris la virinon." Edward Taylor, dekkvinjara: „Mi scias nenion pri Londono." Henry Metthewman, deksepjara: „Mi iras kelkfoje en la preĝejon … Nomo, pri kiu ili predikas, estis iu Jesuo Kristo, sed mi ne povas diri aliajn nomojn, kaj mi ankaŭ povas nenion diri pri li. Li ne estis murdita, sed mortis kiel aliaj homoj. Li iel ne estis kiel aliaj homoj, ĉar li estis iel religia, kaj aliaj ne estas. (He was not the same as other people in some ways, because he was religious in some ways, and others isn't.)" (l.c., 74, p. XV) „La diablo estas bona persono. Mi ne scias kie li vivas. Kristo estis malbonulo." („The devil is a good person. I don't know where he lives. Christ was a wicked man.") „Tiu ĉi knabino (10-jara) literumas God Dog kaj ne konis la nomon de la reĝino." („Ch. Empl. Comm. V. Rep.", 1866, p. 55 n.

Ni aŭdu nun, kiel la kapitalo mem komprenas tiun sistemon de dudek kvar horoj. La ekscesojn de la sistemo, ĝian misuzon por „kruela kaj nekredebla” longigo de la labortago, ĝi kompreneble prisilentas. Ĝi parolas nur pri la sistemo en ĝia „normala” formo.

La s-roj Naylor kaj Vickers, ŝtalfabrikistoj, kiuj dungas inter 600 kaj 700 personojn, kaj el tiuj nur 10 % malpli ol 18-jarajn, kaj el tiuj ĉi nur 20 knabojn por nokta personaro, esprimas sin jene:

> „La knaboj tute ne suferas la varmegon. La temperaturo estas verŝajne 86° ĝis 90° … En la forĝejoj kaj laminejoj la manoj laboras tage kaj nokte alterne, sed aliflanke ankaŭ ĉio alia laboro estas taglaboro, t.e. de la 6-a matene ĝis la 6-a vespere. En la forĝejo oni laboras de la 12-a horo tagmeze ĝis la 12-a nokte. Kelkaj manoj laboras konstante nokte sen ŝanĝo inter taga kaj nokta tempo … Ni ne trovas ke tag- aŭ nokt-laboro faras ian diferencon en la sano” (ĉu de la s-roj Naylor kaj Vickers?) „kaj verŝajne homoj dormas pli bone se ili ĝuas la saman ripozperiodon ol se tiu ŝanĝiĝas … Proksimume dudek knaboj sub 18 jaroj laboras kun la nokta skipo … Ni ne povus bone fari sen la noktlaboro de knaboj malpli ol 18-jaraĝaj. Nia kontraŭargumento estus la pli altaj kostoj de produktado. Lertaj manoj kaj kapoj de departementoj estas malfacile haveblaj, sed knabojn oni akiras tiom kiom oni volas … Kompreneble, konsidere la

278) La sama sistemo kiu regas en la menciitaj metalmanufakturoj regas en la vitro- kaj paper-fabrikoj. En la paperfabrikoj, kie la papero fariĝas per maŝinoj, noktlaboro estas la regulo por ĉiuj procezoj escepte de ĉifonkribrado. En kelkaj kazoj la noktlaboro, pere de alternado, estas senĉese daŭrigata dum la tuta semajno, kutime de dimanĉa nokto ĝis la 12-a nokte de la sekva sabato. La skipo kiu havas la tagan vicon, laboras dum 5 tagoj de 12 horoj kaj dum unu de 18 horoj, kaj tiu de la nokta vico 5 noktojn de 12 horoj kaj unu de 6 horoj, en ĉiu semajno. En aliaj kazoj ĉiu skipo laboras 12 horojn, unu post la alia, en alternaj tagoj. Unu skipo laboras dum 6 horoj lunde kaj 18 sabate, por plenigi 24 horojn. En aliaj kazoj oni enkondukis interan sistemon, en kiu ĉiuj dungitoj laborantaj ĉe la papermaŝinaro laboras ĉiutage en la semajno 15-16 horojn. Tiu sistemo, diras la esplorkomisaro Lord, ŝajnas kunigi en sia ĉiajn malbonaĵojn de la dekduhora kaj dudekkvarhora skipo. Infanoj malpli ol 13-jaraj, junuloj sub 18 jaroj kaj virinoj laboras sub tiu noktsistemo. Kelkfoje, en la dekduhora sistemo, ili devis, pro neveno de la anstataŭantoj, labori la duoblan vicon de 24 horoj. Deklaroj de atestantoj pruvas ke knaboj kaj knabinoj laboras ofte dum kromtempo kiu ne malofte etendiĝas al 24, eĉ 36 horoj de seninterrompa laboro. En la „kontinua kaj neŝanĝebla” procezo de la ĉambroj de glazurado oni trovas 12-jarajn knabinojn kiuj tra la tuta monato laboras ĉiutage 14 horojn, „sen ajna regula ripozo aŭ interrompo krom du, maksimume tri duonhoraj haltoj por manĝoj”. En kelkaj fabrikoj, kie oni tute forlasis la noktlaboron, oni laboras dum terure multa kromtempo, kaj „tio tre ofte en la plej malpuraj, plej varmegaj kaj plej monotonaj procezoj”. („Children's Employment Commission. Report IV”, 1865, p. XXXVIII and XXXIX)

malaltan proporcion de knaboj kiujn ni aplikas, limigoj de noktlaboro estus por ni de malalta graveco aŭ intereso."[135]

S-ro J. Ellis, de la firmao de la s-roj John Brown & Co., ŝtal- kaj feruzinoj, kiuj laborigas 3.000 virojn kaj knabojn, kaj pli precize por parto de la peza ŝtal- kaj fer-laboro „tage kaj nokte, en skipoj", deklaras, ke en la pezaj ŝtaluzinoj unu aŭ du knaboj laboras en proporcio al du viroj. Ilia entrepreno nombras 500 knabojn sub 18-jarajn kaj el tiuj proksimume triono aŭ 170 sub 13 jaroj. Pri la proponita leĝŝanĝo s-ro Ellis opinias:

„Mi ne kredas ke estus tre riproĉinde laborigi nenian personon sub 18 jaroj pli ol 12 horojn el la 24. Sed mi ne kredas ke oni povas difini ian linion super la aĝo de 12 jaroj, ĉe kiu knaboj povus esti liberigitaj el noktlaboro. Ni preferus eĉ akcepti leĝon kiu entute malpermesas dungon de knaboj sub 13-jaroj aŭ eĉ sub 15 jaroj[136], ol malpermeson uzi la knabojn, kiujn ni havas, dum la nokto. Tiuj knaboj kiuj laboras en la taga vico, devas alterne ankaŭ labori en la nokta vico, ĉar la viroj ne povas senĉese labori nur nokte; tio ruinigus ilian sanon. Sed ni kredas ke noktlaboro en alternaj semajnoj ne malutilas."

(La sinjoroj Naylor kaj Vickers kredis, kongrue kun la pleja bono de ilia entrepreno, inverse, ke anstataŭ la senĉesa, ĝuste la periode alternanta noktlaboro eble malutilas.)

„ni trovas la homojn kiuj faras la alternan noktlaboron tute same sanaj kiel tiujn kiuj laboras nur tage … Niaj obĵetoj kontraŭ la neuzado de knaboj malpli ol 18-jaraj por noktlaboro fariĝus pro pli alta elspezo, sed tio estus ankaŭ la sola kialo." (Kiel cinike naiva!) „Ni kredas ke tiu plialtiĝo estus pli granda ol kiun nia komerco (the trade), kun konsidero ŝuldata al ĝia sukcesa okazigo, honeste povus elteni. (As the trade with due regard to etc. could fairly bear!)" (Kia frazeologio!) „Laboro estas ĉi tie rara kaj povus fariĝi nesufiĉa sub tia regulado".

(t.e. Ellis, Brown & Co. povus veni en la fatalan embarason devi pagi la laborforton laŭ ĝia plena valoro)[137]

La „Cyklops ŝtal- kaj ferforĝejoj" de s-roj Cammell kaj K-io estas mastrumataj sammaniere kiel tiuj de la menciita John Brown kaj K-io. La afergvida direktoro enmanigis skribe al la registara komisaro White sian atestan deklaron, sed poste trovis pli oportune neniigi sian manuskripton kiu estis resendita al li laŭ lia peto pretekste de revizii ĝin. Sed s-ro White havas longan memoron. Li memoras tute precize, ke por tiuj s-roj Ciklopoj la malpermeso de noktlaboro por infanoj kaj junuloj estas „afero tute neebla; estus same kvazaŭ oni haltigus iliajn laborojn", kaj tamen ilia entrepreno nombras malmulte pli

135„Fourth Report etc.", 1865, 79, p. XVI.

136*En la angla versio:* sub 14 jaroj. -vl

137l.c. 80, p. XVI, XVII.

ol 6 % da knaboj sub 18 kaj nur 1 % sub 13 jaroj![138]

Pri la sama temo s-ro E. F. Sanderson, de la firmao Sanderson, Bros kaj K-io, ŝtal- lamen- kaj forĝ-entrepreno en Attercliffe, deklaras:

„Grandaj malfacilaĵoj estiĝus el la malpermeso laborigi nokte knabojn malpli ol 18-jarajn, la ĉefa malfacilaĵo fariĝus el la pliiĝo de la kostoj kiun nepre sekvigus anstataŭigo de la knablaboro per virlaboro. Kiom tio estus, mi ne povas diri, sed verŝajne ne estus tiom ke la fabrikisto povus altigi la ŝtalprezon, kaj sekve la perdo falus sur lin, ĉar la viroj" (kia obstina popolo!) „kompreneble rifuzus porti ĝin."

S-ro Sanderson ne scias, kiom li pagas al la infanoj, sed

„eble tio estas 4 ĝis 5 ŝ. pokape por la semajno … La knablaboro estas de tia speco por kiu ĝenerale („generally", kompreneble ne ĉiam „speciale") „la forto de la knabo ĝuste sufiĉas, kaj sekve nenia gajno fluus el la pli granda forto de la viroj por kompensi la perdon, aŭ ja nur en kelkaj kazoj, kie la metalo estas tre peza. La viroj ankaŭ malpli ŝatus ne havi knabojn sub si, ĉar viroj estas malpli obeemaj. Krome la knaboj devas komenci junaĝe lerni la metion. La nura taglaboro ne plenumus tiun celon."

Kaj kial ne? Kial knaboj ne povas lerni sian metion dumtage? Via kialo?

„Ĉar per tio la viroj, kiuj laboras en alternaj semajnoj jen tage jen nokte, estus disigitaj disde la knaboj de sia vico dum la sama tempo, kaj perdus duone la profiton kiun ili eltiras el ili. La instrukcio, kiun ili donas al la knaboj, estas kalkulata kiel parto de la salajro de tiuj knaboj kaj ebligas al la viroj akiri la laboron de la knaboj pli malmultekoste. Ĉiu viro perdus sian duonan profiton."

Alivorte, la s-roj Sanderson devus pagi parton de la salajroj de la plenkreskaj viroj el propra poŝo anstataŭ per noktlaboro de la knaboj. La profito de la s-roj Sanderson iomete falus ĉe tiu okazo, kaj tio estas la Sanderson-a vera kialo pro kiu knaboj ne povas lerni sian metion tage.[139] Krome tio signifus regulan noktlaboron por la viroj, kiuj estus nun senigitaj de la knaboj, kaj tion ili ne eltenus. Mallonge, la malfacilaĵoj estus tiom grandaj ke ili kondukus verŝajne al tuta nuligo de noktlaboro. „Koncerne la produktadon de ŝtalo mem", diras E. F. Sanderson, „tio farus eĉ ne le plej etan diferencon, sed!" Sed la s-roj Sanderson havas ion

138 l.c., p. XVII.

139 „En nia pensoriĉa kaj rezonanta epoko, tiu homo certe ankoraŭ ne multon sukcesis, kiu ne scias diri bonan kialon por ĉio, ankaŭ por la pleja malbono kaj pleja malĝusto. Ĉio, kio en la mondo estis fuŝita, estis fuŝita pro bonaj kialoj." (Hegelo, l.c., p. 249)

plian por fari ol ŝtalon. Ŝtalfarado estas nura preteksto de la plusfarado. La fandfornoj, laminejoj ktp, la konstruaĵoj, la maŝinaro, la fero, la karbo ktp havas ion plian por fari ol transformiĝi en ŝtalon. Ili ekzistas por ensuĉi pluslaboron, kaj kompreneble ensuĉas en 24 horoj pli ol en 12. Ili efektive donas pro Dio kaj pro juro al la Sanderson-oj ordonon je labortempo de certa nombro da manoj por plenaj 24 horoj de la tago kaj perdas sian kapitalkarakteron, estas do por la Sanderson-oj pura perdo, ekde kiam ilia funkcio de laborensuĉado estas interrompita.

> „Sed tiam estus la perdo je tiom multekosta maŝinaro, kiu haltus la duonan tempon, kaj por tia produktokvanto, kiom ni kapablas pretigi ĉe la nuna sistemo, ni devus duobligi niajn konstruaĵojn kaj maŝinarojn, kio duobligus la elspezon."

Sed kial ĝuste tiuj Sanderson-oj pretendas privilegion antaŭ la aliaj kapitalistoj kiuj rajtas laborigi nur tage kaj kies konstruaĵoj, maŝinaro, krudmaterialo do kuŝas neaktive dum la nokto?

*„Estas vere"*, respondas E. F. Sanderson nome de ĉiuj Sanderson-oj, „estas vere ke tiu perdo de neaktiva maŝinaro trafas ĉiujn manufakturojn en kiu oni laboras nur tage. Sed la uzado de la fandfornoj en nia kazo kaŭzus ekstran perdon. Se oni tenas ilin aktivaj, tiam oni ruinigas brulaĵon (anstataŭ nun ruinigi la vivmaterialon de la laboristoj), kaj se oni ne tenas ilin aktivaj, tiam okazus tempoperdo por reestigo de la fajro kaj por akiro de la necesa varmogrado (dum la perdo de dormtempo, eĉ de okjaruloj, estas gajno de labortempo por la Sanderson-aro), kaj la fornoj mem suferus pro la temperaturŝanĝo" (dum la samaj fornoj neniom suferas pro taga kaj nokta ŝanĝiĝo de la laboro).[140]

140„Children's Employment Commission. Fourth Report", 1865, 85, p. XVII. Al simile tenera skrupulo de la s-ro vitrofabrikisto, ke „regulaj manĝoj" de la infanoj maleblas, ĉar per tio certa kvanto da varmo kiun elradias la fornoj estus „pura perdo" aŭ ili estus „ruinigitaj", la esplorkomisaro White respondas, tute ne kiel Ure, Senior ktp kaj iliaj germanaj ripetantoj kiel Roscher ktp, emociitaj de la „sindeteno", „abnegacio" kaj „ŝparemo" de la kapitalistoj ĉe elspezo de sia mono kaj de ilia „malŝparemo" kun kiu ili elspezas homajn vivojn, digna de Timuro kaj Tamerlano: „Certa kvanto da varmo povas esti ruinigita trans la nuna mezuro sekve al certigo de regulaj manĝoj, sed eĉ en mona valoro tio estas nenio kompare kun la ruinigo de vivforto (the waste of animal power), kiu nun estiĝas al la reĝlando per tio ke infanoj en kreska stato uzataj en la vitrofabrikoj eĉ ne trovas la trankvilon por manĝi kaj digesti siajn manĝaĵojn." (l.c., p. XLV) Kaj tio en la „progresjaro" 1865! Sen konsidero pri la fortelspezo per portado, levado, tia infano marŝas en la fabrikoj kiuj faras botelojn kaj flinton, dum la konstanta plenumado de sia laboro, 15 ĝis 20 (anglajn) mejlojn! En multaj tiaj vitrofabrikoj regas, kiel

# 5. La batalo pri la normallabortago. Trudleĝoj por plilongigo de la labortago ekde la mezo de la 14-a ĝis fine de la 17-a jarcento

„Kio estas labortago?” Kiom grandas la tempo dum kiu la kapitalo rajtas konsumi la laborforton kies tagvaloron ĝi pagas? Kiom la labortago longigeblas trans la labortempo necesa por reproduktiĝo de la laborforto mem? Al tiuj demandoj, kiel oni vidis, la kapitalo respondas: La labortago havas ĉiutage plenajn 24 horojn post dekalkulo de la malmultaj ripozhoroj sen kiuj la laborforto absolute ne faras sian denovan servon. Estas memkompreneble ke la laboristo dum sia tuta vivo estas nenio alia ol laborforto, ke do lia tuta disponebla tempo pro naturo kaj pro juro estas labortempo, do apartenas al la memvalorigo de la kapitalo. Tempo por homa kleriĝo, por spirita disvolviĝo, por plenumado de sociaj funkcioj, por sociaj rilatoj, por libera ludo de la korpaj kaj spiritaj vivfortoj, eĉ la libertempo de dimanĉo – kaj eĉ se en la lando de la sabatuloj[141] – puraj

en la ŝpinejoj de Moskvo, la sistemo de seshoraj alternoj. „Dum la labortempo de la semajno ses horoj estas la plej ekstrema seninterrompa ripozperiodo, kaj de tiu subtrahendas la tempo por ili al kaj de la fabriko, laviĝo, vestiĝo, manĝoj, kio ĉio kostas tempon. Tiel restas fakte nur la plej mallonga ripoztempo. Nenia tempo por ludi kaj freŝa aero, krom se surkoste de dormo, tiom nemalhavebla por infanoj kiuj en tiom varmega atmosfero plenumas tiom penigan laboron … Eĉ la mallonga dormo estas interrompata per tio ke la infano devas mem vekiĝi nokte aŭ estas vekata dumtage de ekstera bruo.” S-ro White citas kazojn en kiuj knaboj de 12 jaroj laboras ĝis la 2-a nokte kaj poste dormas en la fabriko ĝis la 5-a matene (3 horojn!), por rekomenci sian taglaboron! „La kvanto da laboro”, diras la redaktintoj de la ĝenerala raporto, Tremenheere kaj Tufnell, „kiun knaboj, knabinoj kaj virinoj plenumas dum sia taga aŭ nokta laborvico (spell of labour), estas fabela.” (.c., p. XLIV) Intertempe, iun vesperon malfrue, eble la „abnegacia” vitrokapitalo eble ŝanceliĝas, ebriete de portovino, el la klubo hejmen, idiote zumante antaŭ si: „Britons never, never shall be slaves!” <„Britoj neniam, neniam estos sklavoj!”>

141 En Anglio ekz-e okazas daŭre ie kaj tie en la kamparo ke laboristo estas kondamnita al malliberejo pro malsanktigo [profanigo -vl] de la sabato per laboro en la ĝardeneto antaŭ sia domo. La sama laboristo estas punata pro rompo de kontrakto, se li dimanĉe, eĉ pro religiaj kapricoj, ne venas al la metal-, paper- aŭ vitro-fabriko. La ortodoksa parlamento ne havas orelon por sabat-malsanktigo kiam ĝi okazas en la „plivalorig-procezo” de la kapitalo. En

frivolaĵoj! Sed en sia senmezure blinda instinkto, sia lup-malsatego je pluslaboro, la kapitalo transkuras ne nur la moralajn, sed ankaŭ la pure korpajn maksimumajn limojn de la labortago. Ĝi uzurpas la tempon por kreskado, disvolviĝo kaj sana konservado de la korpo. Ĝi rabas la tempon necesan por konsumo de libera aero kaj sunlumo. Ĝi popece rongâs partojn de la manĝotempo kaj enkorpigas ĝin laŭeble en la produktadprocezon mem, tiel ke oni aldonas al la laboristo kiel nuran produktadrimedon nutraĵojn kiel al la vaporkaldrono karbon kaj al la maŝinaro sebon aŭ oleon. La sanan dormon por kolektiĝo, renoviĝo kaj refreŝiĝo de la vivforto ĝi reduktas al tiom da horoj de peza torporo kiom nepras por revivigi absolute elĉerpitan organismon. Anstataŭ ke la normala konservado de la laborforto determinas la limon de la labortago, inverse la kiom eble plej granda elspezo de laborforto, kiom ajn perforta kaj peniga, determinas la limon de la ripoztempo de la laboristo. La kapitalo ne demandas pri la vivdaŭro de la laborforto. Kio interesas ĝin estas absolute nur la maksimumo de laborforto fluigebla en unu labortago. Ĝi atingas tiun celon per mallongigo de la daŭro de la laborforto, kiel avida kampkulturisto atingas pli altan rikolton de sia grundo per rabado de la grundfekundeco.

La kapitalisma produktado, kiu estas esence produktado de plusvaloro, ensuĉado de pluslaboro, produktas do kun la plilongigo de la labortago ne nur la kadukiĝon de la homa laborforto, prirabata je siaj normalaj moralaj kaj korpaj disvolviĝ- kaj agad-kondiĉoj. Ĝi produktas la antaŭtempajn elĉerpiĝon kaj morton de tiu laborforto mem.[142] Ĝi longigas la produktadtempon de la laboristo dum donita tempo per mallongigo de lia vivtempo.

Sed la valoro de la laborforto inkludas la valoron de la varoj kiuj estas necesaj por la reproduktiĝo de la laboristo aŭ por reproduktiĝo de la laborista klaso. Do, se la kontraŭnatura longigo de la labortago, kiun la

memoraĵo (aŭgusto 1863), en kiu la londonaj taglaboristoj en fiŝ- kaj kortbirdvendejoj postulas la nuligon de dimanĉlaboro, ili diras ke ilia laboro daŭras dum la unuaj 6 semajntagoj mezume 15 horojn tage kaj dimanĉe 8 ĝis 10 horojn. Oni samtempe komprenas el tiu memoraĵo ke estas ĉefe la delikata frandemo de la aristokrataj bigotoj de Exeter Hall kiu kuraĝigas al tiu „dimanĉlaboro”. Tiuj „sanktuloj”, tiom diligente zorgantaj pri sia korpa bonstato, pruvas sian kristanecon per la sindonemo per kiu ili eltenas la ekscesan laboron, la malhavojn kaj la malsaton de triaj personoj. La festenado estas por ili (la laboristoj) multe pli malutila. [*Originale en la latina:* Obsequium ventris istis (la laboristoj) perniciosius est. -vl]

142 „En niaj antaŭaj raportoj ni redonis la konstatojn de diversaj spertaj fabrikistoj, kiuj diras, ke kromhoroj … certe entenas la danĝeron antaŭtempe elĉerpi la laborforton de la homo.” l.c., 64, p. XIII.

kapitalo nepre alstrebas en sia senmezura instinkto je memvalorigo, mallongigas la vivperiodon de la individua laboristo kaj per tio la daŭron de lia laborforto, tiam necesas pli rapida anstataŭado de la eluzita laborforto, kaj la sumo de elspezoj por reproduktiĝo de la laborforto estas pli granda; same kiel la valorparto ĉiutage reproduktenda de maŝino estas des pli granda ju pli rapide ĝi eluziĝas. Ŝajnas do ke la intereso de la kapitalo mem postulas labortagon normalan.

La sklavisto aĉetas sian laboriston, kiel li aĉetas ĉevalon. Se li perdas la sklavon li perdas per tio kapitalon, kiu estas anstataŭigenda per nova elspezo sur la sklavmerkato. Sed

> „kiom ajn fatala kaj detrua estas la influo de la rizkampoj de Georgio kaj de la marĉoj de Misisipio por la homa konstitucio, ilia detruado de homa vivo ne estas tiom granda ke ĝi ne supereblus de la tro abundaj rezervoj de Virginio kaj Kentukio. Ekonomiaj konsideroj, kiuj povus doni ian sekurecon por la homa traktado de la sklavo, se ili identigas la intereson de la mastro kun la konservado de la sklavo, transformiĝas, post enkonduko de la sklavkomerco, inverse en kialojn por la plej ekstrema ruinigo de la sklavo, ĉar ekde kiam lia loko plenigeblas per provizo el fremdaj nigrulaj rezervejoj, la daŭro de lia vivo fariĝas malpli grava ol ĝia produktivo, tiom longe kiom ĝi daŭras. Estas do maksimo de la sklava ekonomio en landoj de sklavimporto, ke la plej efika ekonomio konsistas en tio, elpremi la kiom eble plej grandan kvanton da laboro en kiom eble plej mallonga tempo el la hombruto (human cattle). Ĝuste en tropika kulturo, kie la jaraj profitoj egalas ofte la ĉiomkapitalon, la nigrula vivo estas plej senskrupule oferata. Estas la kampkulturo de Okcidenta Hindio, de jarcentoj la lulilo de fabelaj riĉaĵoj, kiu voris milionojn de la afrika raso. Nuntempe estas Kubo, kies profitoj nombras milionojn kaj kies plantistoj estas princoj, kie ni vidas ĉe la sklava klaso krom la plej krudan nutraĵon, la plej elĉerpigan kaj plej senĉesan turmentan penadon, grandan parton ĉiujare rekte perei pro malrapida torturo de ekscesa laboro kaj manko de dormo kaj de ripozo."[143]

Mutato nomine de te fabula narratur![144] <Sub alia nomo oni raportas ĉi tie pri vi!> Legu anstataŭ sklavkomerco laborkomercon, anstataŭ Kentukio kaj Virginio Irlandon kaj la terkulturajn distriktojn de Anglio, Skotlando kaj Kimbrio, anstataŭ Afriko Germanion! Ni aŭdis kiel la ekscesa laboro forvoras la bakistojn de Londono, kaj tamen la londona labormerkato estas ĉiam plenplena de germanaj kaj aliaj mortkandidatoj por la bakejoj. La potfarado, kiel ni vidis, estas unu el la plej mallongvivigaj industribranĉoj. Ĉu pro tio mankas ceramikistoj? Josiah Wedgwood, la

143 Cairnes, l.c., p. 10, 111.

144 Horacio. -vl

inventinto de la moderna ceramikejo, komence mem ordinara laboristo, deklaris 1785 antaŭ la ĉambro de deputitoj, ke la tuta manufakturo laborigas 15.000 ĝis 20.000 personojn.[145] En la jaro 1861 la loĝantaro nur de la urbaj sidejoj de tiu industrio en Britio estis 101.302.

> „La kotonindustrio estas 90 jarojn aĝa … En tri generacioj de la angla raso ĝi konsumis naŭ generaciojn de kotonlaboristoj."[146]

Tamen, en kelkaj epokoj de febra altkonjunkturo la labormerkato montris zorgigajn breĉojn. Tiel ekz-e en 1834. Sed la sinjoroj fabrikistoj proponis nun al la komisaroj de la malriĉul-instanco[147], sendi la „troan loĝantaron" de la kampkulturaj distriktoj al la nordo kun la klarigo ke „la fabrikistoj sorbos kaj konsumos ilin". Tiuj estis iliaj propraj vortoj.[148]

> „Oni enoficigis agentojn en Manĉestro kun la permeso de la komisaroj de la malriĉul-instanco. Oni preparis listojn de kampkulturaj laboristoj kaj transdonis ilin al tiuj agentoj. La fabrikistoj kuris en la oficejojn, kaj post kiam ili elektis tion kio taŭgis por ili, la familioj estis senditaj el la sudo de Anglio. Tiuj hompakaĵoj estis liveritaj kun etikedoj kvazaŭ same multaj varpakaĵoj, sur kanalo kaj ŝarĝveturiloj – kelkaj postsekvis piede, kaj multaj erarvagadis perdite kaj duone malsatmortaj en la manufakturdistriktoj. Tio evoluis al vera komerca branĉo. La ĉambro de deputitoj apenaŭ kredos tion. Tiu regula komerco, tiu ŝakrado pri homkarno daŭris, kaj tiuj homoj estis aĉetataj kaj vendataj de la manĉestraj agentoj al la manĉestraj fabrikistoj, tute same regule kiel nigruloj al la kotonplantistoj de la sudaj ŝtatoj … La jaro 1860 estis la kulmino de la kotonindustrio … Ree mankis manoj. La fabrikistoj direktis sin ree al la karnagentoj … kaj tiuj traserĉis la dunojn de Dorset, la montetojn de Devon kaj la ebenaĵojn de Wilts, sed la troa loĝantaro estis jam konsumita."

La Bury Guardian lamentis ke sorbeblus 10.000 kromaj manoj post subskribo de la angla-franca komerctraktato kaj ke baldaŭ necesos proksimume 30.000 aŭ 40.000 kromaj. Post kiam la agentoj kaj subagentoj de la karnkomerco trabalais la kampkulturajn distriktojn 1860 sufiĉe senrezulte,

> „fabrikista deputacio direktis sin al s-ro Villiers, prezidanto de la malriĉula instanco, kun la peto permesi ke oni ree liveru malriĉajn infanojn kaj orfojn el

---

145 John Ward, „History of the Borough of Stoke-upon-Trent etc.", Londono, 1843, p. 42.

146 La parolado de Ferrand en la „House of Commons" de la 27-a de aprilo 1863.

147 *En la originalo:* „den Poor Law Commissioners <Kommissären der Armenbehörde>", en la sekvo sen la interkrampa germanigo. -vl

148 „That the manufacturers would absorb it and use it up. Those were the very words used by the cotton manufacturers." (saml.)

certaj labordomoj por la fabrikoj en Lankaŝiro."[149]

Tio, kion la sperto ĝenerale montras al la kapitalisto, estas konstanta troeco de la loĝantaro, t.e. troeco da loĝantoj en proporcio al la momenta valorigbezono de la kapitalo, kvankam ili konsistas el generacioj miskreskaj, mallongvivaj, rapide sekvantaj unu la alian, kvazaŭ nematurе plukitaj.[150] Tamen la sperto montras al la inteligenta observanto aliflanke, kiom rapide kaj profunde la kapitalisma produktado, kiu, el historia vidpunkto, estas apenaŭ de hieraŭ, kaptis la popolforton ĉe la vivradiko, kiel la degenerado de la industria loĝantaro malrapidiĝas nur per konstanta sorbado de naturaj vivelementoj el la kamparo kaj kiel eĉ la kamparaj laboristoj, spite al libera aero kaj la principo de natura selekto[151] kiu tiom potence regas inter ili kaj lasas nur la plej fortajn individuojn elkreski, jam komencas malfortiĝi.[152] La kapitalo, kiu havas tiom „bonajn kialojn" nei la suferojn de la ĝin ĉirkaŭanta laborista loĝantaro, estas en sia praktika moviĝo same multe aŭ malmulte influata de la perspektivo de estonta putriĝo de la homaro kaj fine nehaltigebla senpopoliĝo kiel de la ebla falo de la tero sur la sunon. Ĉe ĉiu akcispekulado ĉiu scias ke la fulmotondro iam frapos, sed ĉiu esperas ke ĝi trafos la kapon de sia proksimulo, post kiam li mem kaptis la orpluvon kaj metis ĝin en sekuran lokon. Post mi la diluvo![153] estas la slogano de ĉiu kapitalisto kaj de ĉiu kapitalista nacio. La kapitalo fajfas do pri sano kaj vivdaŭro de la laboristo, kie ĝi ne estas

149 „por la fabrikoj en Lankaŝiro" estas aldono de la angla versio. -vl

150 „La trolaborintoj mortas kun stranga rapideco; sed la lokoj de tiuj kiuj pereas estas tuj replenigitaj, kaj oftega ŝanĝo de la personoj ne kaŭzas ŝanĝon sur la scenejo." „England and America", Londono, 1833, vol. I, p. 55. (Aŭtoro E. G. Wakefield)

151 *En la originalo:* principle of natural selection <Prinzips der natürlichen Auslese>. -vl

152 Vd „Public Health. Sixth Report of the Medical Officer of the Privy Council. 1863". Publikigita Londono 1864. Tiu raporto pritraktas ĉefe la terkulturajn laboristojn. „Oni prezentis la graflandon Sutherland kiel tre pliboniĝintan graflandon, sed nova esploro malkovris ke tie en distriktoj kiuj iam famis pro belaj viroj kaj bravaj soldatoj, la loĝantoj estas degenerintaj al magra kaj kadukiĝinta raso. En la plej sanfavoraj situoj, sur montetaj deklivoj vide al la maro, la vizaĝoj de iliaj infanoj estas malgrasaj kaj palaj, kiaj ili povas esti nur en la putra atmosfero de londona strateto." (Thornton, l.c., p. 74, 75) Ili efektive similas al la 30.000 „gallant Highlanders" <"kavaliraj altlandanoj">, kiujn Glasgovo en siaj stratetoj kaj kortoj kunigas kun prostituitinoj kaj ŝtelistoj.

153 *En la originalo france:* Après moi le déluge! -vl

devigata de la socio respekti ilin.[154] Al la plendo pri korpa kaj spirita malfortiĝo, pri antaŭtempa morto, torturo de ekscesa laboro, ĝi respondas: Kial tiu turmento turmentu nin, ĝi ja pliigas nian ĝuon (la profiton)? Sed ĝenerale tio ankaŭ ne dependas de la bona aŭ malbona volo de la individua kapitalisto. La libera konkurenco trudas al la individua kapitalisto la imanentajn leĝojn de la kapitalisma produktado kiel eksteran trudleĝon.[155]

La determinado de normala labortago estas la rezulto de multcentjara batalo inter kapitalisto kaj laboristo. Sed la historio de tiu batalo montras du kontraŭajn tendencojn. Oni komparu ekz-e la niatempan anglan fabrikleĝaron kun la anglaj laborstatutoj de la 14-a ĝis profunde en la mezo de la 18-a jarcento.[156] Dum la moderna fabrikleĝo perforte mallongigas la labortagon, tiuj statutoj provas perforte longigi ĝin. Tamen pretendoj de la kapitalo en embria stato, dum kiu ĝi ankoraŭ nur fariĝas kapitalo, do

---

154 „Kvankam la sano de la loĝantaro estas tiom grava elemento de la nacia kapitalo, ni timas devi konfesi ke la kapitalistoj tute ne pretas konservi kaj estimi tiun trezoron … La respekto de la sano de la laboristoj estis truditaj al la fabrikitoj.” (Times, 5-a de novembro 1861) „La viroj de West Riding fariĝis la tukfaristoj de la homaro … la sano de la laborista popolo estis oferita, kaj en kelkaj generacioj la raso estus degenerinta, sed okazis reago. La horoj da infanlaboroj estis limigitaj ktp.” („Twenty-second annual report of the Registrar-General”, 1861)

155 Pro tio ni trovas ekz-e ke komence de 1863 26 firmaoj kiuj posedas gravajn ceramikejojn en Staffordshire, inter ili ankaŭ J. Wedgewood kaj Filoj, en memoraĵo petas pri „perforta enmiksiĝo de la ŝtato”. La „konkurenco kun aliaj kapitalistoj” ne permesas al ili „libervolan” limigon de la labortempo de infanoj ktp. „Kiom ajn ni bedaŭras la supre menciitajn malbonaĵojn, ne eblus malhelpi ilin per ia speco de interkonsento inter la fabrikistoj … Konsidere al ĉiuj ĉi punktoj, ni konvinkiĝis ke necesas truda leĝo.” („Children's Emp. Comm., Rep. 1”, 1863, p. 322)

*Aldono al tiu ĉi noto:* Multe pli frapan ekzemplon donis la lastatempa historio. La alteco de la kotonprezoj, en epoko de febra industria aktiveco instigis la posedantojn de kotonteksejoj en Blackburn, per komuna interkonsento mallongigi la labortempon en siaj fabrikoj dum difinita periodo. Tiu periodo finiĝis proksimume fine de novembro (1871). Intertempe la pli riĉaj fabrikistoj, kiuj ligas ŝpinadon kun teksado, utiligis la malpliiĝon de la produktado kaŭzita de tiu interkonsento por etendi siajn proprajn aferojn kaj tiel fari grandajn profitojn surkoste de la malgrandaj mastroj. Tiuj en sia ekstrema situacio direktis sin – al la fabriklaboristoj, alvokis ilin fari seriozan agitadon por la naŭhora labortago kaj promesis monsumojn por tio!

156 Tiuj laborstatutoj, kiujn oni trovas por la sama tempo ankaŭ en Francio, Nederlando ktp, estis unue en Anglio formale nuligitaj, post kiam ili estis delonge forigitaj de la produktadkondiĉoj.

ankoraŭ ne per nura forto de la ekonomiaj kondiĉoj, sed ankaŭ helpe de la ŝtatpotenco certigas sian rajton ensuĉi sufiĉan kvanton de pluslaboro, ŝajnas tute modestaj, se oni komparas ilin kun la koncedoj kiujn ĝi devas fari en sia matura aĝo grumblante kaj malvolonte. Necesis jarcentoj ĝis kiam la „libera" laboristo sekve al evoluinta kapitalisma produktadmaniero libervole akceptas, t.e. estas socie devigata, por la prezo de siaj kutimaj vivrimedoj vendi sian tutan aktivan vivtempon, eĉ sian laborkapablon mem, sian unuenaskitecon por lentoplado[157]. Estas do nature ke la longigo de la labortago, kiun la kapitalo ekde la mezo de la 14-a jarcento ĝis la fino de la 17-a jarcento provas trudi al la plenkreskuloj helpe de la ŝtatpotenco, proksimume kongruas kun la limo de la labortempo, kiun en la dua duono de la 19-a jarcento la ŝtato ie kaj tie trudas al la transformado de infansango en kapitalon. Kio hodiaŭ, ekz-e en la ŝtato Masaĉuseco, ĝis antaŭ nelonge la plej libera ŝtato de la nordamerika respubliko, estis proklamita kiel ŝtata limo de laboro de infanoj sub 12-jaraj, estis en Anglio ankoraŭ meze de la 17-a jarcento la normala labortago de fortaj metiistoj, de fortikaj bienservistoj kaj gigantaj forĝistoj.[158]

La unua „Statute of Labourers" <"laboriststatuto"> (Eduardo la 3-a, 1349) trovis sian pretekston – ne sian kaŭzon, ĉar tia leĝaro daŭras jarcentojn post kiam la preteksto malaperis – en la granda pesto kiu amaspereigis la loĝantaron, tiom ke, laŭ la esprimo de konservativa verkisto, „la malfacilo laborigi laboristojn je moderaj prezoj" (t.e. je prezoj kiuj lasis al iliaj mastroj moderan kvanton da pluslaboro) „fariĝis fakte neeltenebla"[159] Moderaj salajroj estis do trudleĝe diktitaj, same kiel

157 Aludo al biblia rakonto pri Jakobo kiu misuzis la malsaton de sia frato Esavo por akiri de li la rajton de unuenaskiteco-- ligitan kun privilegioj – kontraŭ plado de lentoj: „Jakob donis al Esav panon kaj kuiraĵon el lentoj" (Genezo 27). -vl

158 „Neniu infano sub 12 jaroj rajtas esti okupata en fabrikentrepreno pli longe ol 10 horojn tage." („General Statutes of Massachusetts", ch. 60, § 3. La diversaj statutoj estis deciditaj inter 1836 kaj 1858) „Laboro, kiu estas farata en tempospaco de 10 horoj tage en ĉiuj koton-, lan-, silk-, paper-, vitro- kaj lin-fabrikoj aŭ en entreprenoj kiuj prilaboras feron aŭ aliajn metalojn, estu konsiderata taglaboro en leĝa senco. Krome estu leĝe fiksita ke estonte neniu neplenkreskulo malpli ol 10-jara rajtas esti dungita en iu ajn fabriko sur la teritorio de tiu ĉi ŝtato." („State of New Jersey. An act to limit the hours of labour etc.", § 1 kaj 2-a leĝo de la 18-a de marto 1851) „Neniu neplenkreskulo inter 12- kaj 15-jaraĝa rajtas esti laborigata en ia ajn fabrikentrepreno dum pli ol 11 horoj tage aŭ antaŭ la 5-a horo matene aŭ post la 7-a kaj duono vespere." („Revised Statutes of the State of Rhode Island etc.", ch. 139, § 23, 1st July 1857)

159 [J. B. Byles,] „Sophisms of Free Trade", 7th edit., Londono, 1850, p. 205. La

la limo de la labortago. La lasta punkto, kiu sole interesas nin ĉi tie, estis ripetita en la statuto de 1496 (sub Henriko la 7-a). La labortago por ĉiuj metiistoj (artificers) kaj kamplaboristoj de marto ĝis septembro devis tiam, kio tamen estis neniam plenumita, daŭri de la 5-a horo matene ĝis inter la 7-a kaj la 8-a horo vespere, sed la horoj por manĝoj estas 1 horo por matenmanĝo, $1^1/_2$ horoj por tagmanĝo kaj $^1/_2$ horo por posttagmeza manĝeto, do ĝuste la duoblo de la nun valida fabrikleĝo.[160] Dum vintro la laboro devis komenciĝi je la 5-a horo matene kaj finiĝi je la vespera krepusko kun la samaj paŭzoj. Statuto de Elizabeto de 1562 por ĉiuj laboristoj „dungitaj por salajro tage aŭ semajne” ne tuŝas la longecon de la labortago, sed provas limigi la tempajn interspacojn je $2^1/_2$ horoj por somero kaj 2 por vintro. Tagmanĝo daŭru nur unu horon kaj „la duonhora posttagmeza dormo” estu permesata nur inter mezo de majo kaj mezo de aŭgusto. Por ĉiu horo da malĉeesto, 1 d (proksimume 8 pfenigoj[161]) estu deprenita de la salajro. Tamen en la praktiko la kondiĉoj estis pli favoraj al la laboristoj ol en la statutlibro. William Petty, la patro de la politika ekonomio kaj ĝis certa punkto la inventinto de la statistiko, diras en verko kiun li aperigis en la lasta triono de la 17-a jarcento:

> „La laboristoj” (labouring men, envere tiam kamplaboristoj) „laboras 10 horojn tage kaj prenas semajne 20 manĝojn, nome en labortagoj tage tri kaj dimanĉe du; el tio oni klare vidas ke, se ili volis malsati je vendredaj vesperoj kaj tagmanĝi en horo kaj duono, dum ili nun bezonas por tiu manĝo du horojn, de la 11-a matene ĝis la 1-a, se ili do laborus 1/20 pli kaj konsumus 1/20 malpli, la dekono de la supre menciita imposto estus pagebla.”[162]

Ĉu D-ro Andrew Ure ne pravis kiam li denuncis la dekhor-leĝon de

sama konservativulo cetere koncedas: „Parlamentaj aktoj, kiuj regulis la salajrojn kontraŭ la laboristoj favore al la dungistoj, daŭris dum la longa periodo de 164 jaroj. La loĝantaro kreskis. Tiuj leĝoj fariĝis nun superfluaj kaj ĝenaj.” (l.c., p. 206)

160 Wade rimarkigas prave, koncerne tiun statuton: „El la statuto de 1496 evidentiĝas ke la nutraĵo estis konsiderata ekvivalento por duono de la enspezo de metiisto kaj duono de la enspezo de kampkultura laboristo, kaj tio montras pli grandan gradon de sendependeco de la laboristoj ol ĝi regas nun, kie la nutraĵo de la laboristoj en kampkulturo kaj manufakturo konsistigas multe pli altan proporcion al iliaj salajroj.” (J. Wade, l.c., p. 24, 25 kaj 577) La opinion, ke tiu diferenco okazas pro la diferenco de prezoj inter nutraĵoj kaj vestaĵoj, nun kaj tiam, refutas la plej supraĵa rigardo al „Chronicon Preciosum etc.” By Bishop Fleetwood, 1st edit., Londono, 1707, 2nd edit., Londono, 1745.

161 *En la angla eldono:* „one penny”. *En la franca eldono:* „10 centimes”. -vl

162 W. Petty: „Political Anatomy of Ireland, 1672”, eld. 1691, p. 10.

1833 kiel malprogreson en la tempon de la mallumo? Tamen la disponoj menciitaj en la statutoj kaj de Petty validas ankaŭ por metilernantoj. Sed kia estis la situacio de infanlaboro ankoraŭ fine de la 17-a jarcento, tion oni vidas tuj el la sekvaj plendoj:

> „Niaj junuloj, ĉi tie en Anglio, faras absolute nenion ĝis la tempo kiam ili fariĝas metilernantoj, kaj tiam ili bezonas kompreneble longan tempon – sep jarojn – por formiĝi al perfektaj metiistoj."

Germanio estas, male, laŭdata ĉar tie la infanoj estas edukataj ekde la lulilo al „iomete da okupiĝo".[163]

Dum la plej granda parto de la 18-a jarcento, ĝis la epoko de la granda industrio, la kapitalo ne sukcesis, per pago de la samajna valoro de la laborforto, alproprigi al si la tutan semajnon de la laboristo, kun tamen la escepto de la kamplaboristoj. La cirkonstanco ke ili povis vivi tutan semajnon per 4-taga salajro, ne ŝajnis al la laboristoj sufiĉa kialo por

163„A Discourse on the Necessity of Encouraging Mechanick Industry", Londono, 1690, p. 13. Macaulay, kiu falsis la anglan historion en la intereso de la Whig kaj burĝoj, deklamas jene: „La praktiko, laborigi infanojn antaŭtempe, regis en la 17-a jarcento en preskaŭ nekredebla grado por la tiama stato de la industrio. En Norwich, la ĉefsidejo de la lanindustrio, sesjara infano estis konsiderata laborkapabla. Diversaj verkistoj de tiu tempo kaj el tiuj pluraj konsiderataj kiel eksterordinare bonintencaj, mencias kun ĝojego la fakton ke en tiu urbo sole geknaboj kreas riĉaĵon kiu valoras krom ilian propran vivtenadon 12.000 sterlingajn pundojn jare. Ju pli precize ni esploras la historion de la pasinteco, des pli da kialoj ni trovas refuti la opinion de tiuj kiuj taksas nian epokon kiel fruktodonan je novaj sociaj malbonaĵoj. Tio, kio estas nova, estas la inteligento kiu malkovras la malbonaĵojn, kaj la humaneco kiu kuracas ilin." („History of England", vol. I, p. 417) Macaulay povintus raporti plu, ke „eksterordinare bonintencaj" amikoj de komerco en la 17-a jarcento rakontas kun „ĝojego", kiel en malriĉulejo en Holando 4-jara infano estis laborigata, kaj ke tiu ekzemplo de „aplikata virto" estis citata kiel modelo en ĉiuj verkoj de humanistoj de la speco de Macaulay, ĝis en la epoko de Adam Smith. Estas vere, ke kun la apero de la manufakturo, malsame ol en la metio, montriĝas spuroj de infanekspluatado kiu ekzistas de ĉiam en certa grado ĉe la terkulturistoj kaj kiu estis des pli evoluinta, ju pli la jugo de la kampulo pezis. La tendenco de la kapitalo estas evidenta, sed la faktoj mem estas ankoraŭ tiom izolitaj kiel la apero de dukapaj infanoj. Pro tio ili estis registritaj kun „ĝojego", kiel aparte notindaj kaj admirindaj, de antaŭsentaj „amikoj de komerco" por la samtempuloj kaj por la posteularo kaj rekomendataj por imito. La sama skota jesulaĉo kaj belparolisto Macaulay diras: „Oni aŭdu hodiaŭ nur pri malprogreso kaj vidu nur progreson." Kiaj okuloj kaj ĉefe kiaj oreloj!

labori ankaŭ la aliajn du tagojn por la kapitalisto. Unu flanko de la anglaj ekonomikistoj denuncis, en la servo de la kapitalo, tiun obstinon plej furioze, alia flanko defendis la laboristojn. Ni aŭdu ekz-e la polemikon inter Postlethwayt, kies komerca vortaro ĝuis siatempe la saman famon kiel nuntempe similaj skribaĵoj de MacCulloch kaj MacGregor kaj de la antaŭe citita aŭtoro de la „Essay on Trade and Commerce”.[164]

Postlethwayt diras interalie:

> „Mi ne povas fini tiujn ĉi malmultajn rimarkojn sen noti la trivialan diron en la buŝo de tiom multaj, ke, se la laboristo (industrious poor) en 5 tagoj povas ricevi sufiĉe por vivi, li ne volas labori plenajn 6 tagojn. Pro tio ili konkludas pri la neceso plikarigi eĉ la necesajn vivrimedojn per impostoj aŭ per iaj ajn aliaj rimedoj, por devigi la metiiston kaj manufakturlaboriston al senĉesa sestaga laboro en la semajno. Mi devas peti la permeson havi alian opinion ol tiuj grandaj politikistoj, kiuj pledas por la konstanta sklaveco de la laboranta loĝantaro de tiu ĉi reĝlando (the perpetual slavery of the working people); ili forgesas la proverbon „nur laboro kaj nenia ludo stultigas”[165]. Ĉu la angloj ne fieras pri la genieco kaj lerteco de siaj metiistoj kaj manufakturlaboristoj, kiuj ĝis nun akiris por la britaj varoj ĝeneralajn krediton kaj famon? Al kiu cirkonstanco tio estis ŝuldata? Verŝajne al neniu alia ol la gaja kaj originala maniero en kiu nia laborista popolo scias distriĝi. Se ili estus devigataj labori tra la tuta jaro, ĉiujn ses tagojn en la semajno, en konstanta ripetiĝo de la sama laboro, ĉu tio ne malakrigus ilian geniecon kaj igus ilin stultaj kaj inertaj, kaj ĉu niaj laboristoj, sekve al tia eterna sklaveco, ne perdus sian famon anstataŭ konservi ĝin? … Kian artan lertecon ni povus atendi de tiom peze laborigataj animaloj (hard driven animals)? … Multaj el ili plenumas tiom da laboro en 4 tagoj kiom franco en 5 aŭ 6. Sed se angloj devas esti eternaj servutuloj, tiam oni devas timi ke ili degeneros ankoraŭ sub la francoj. Se nia popolo estas fama pri sia braveco en milito, ĉu ni ne diras ke tio estas ŝuldata unuflanke al la bona angla *roastbeef* kaj *pudding* en ĝia ventro, aliflanke ne malpli al nia konstitucia spirito de libereco? Kaj kial la pli grandaj genieco, energio kaj

164 Inter la akuzantoj de la laboristoj la plej akra estis la en la teksto menciita anonima aŭtoro de: „An Essay on Trade and Commerce: containing Observations on Taxation etc.”, Londono, 1770. Jam pli frue en sia skribaĵo „Consideration on Taxes”, Londono, 1765. Ankaŭ Polonius Arthur Young, la neesprimebla statista babilaĉulo, sekvas la saman linion. Inter la defendantoj de la laboristoj elstaras: Jacob Vanderlint en „Money answers all things”, Londono, 1734, Rev. Nathaniel Forster, D. D. en „An Enquiry into the Causes of the Present [High] Price of Provisions”, Londono, 1767, D-ro Price, kaj aparte ankaŭ Postlethwayt, en suplemento al sia „Universal Dictionary of Trade and Commerce” kiel ankaŭ en „Great Britain's Commercial Interest explained and improved”, 2nd edit., Londono, 1759. La faktojn mem oni trovas ĉe multaj aliaj samtempaj verkistoj konstatitaj, i.a. ĉe Josiah Tucker.

165 *En la originalo:* „all work and no play etc.” -vl

lerteco de niaj metiistoj kaj manufakturlaboristoj ne estu ŝuldataj al la libereco, per kiu ili distras sin laŭ sia propra maniero? Mi esperas ke ili neniam perdos tiujn privilegiojn, nek la bonan vivon el kiuj devenas same ilia laborlerteco kaj ilia kuraĝo!"[166]

Al tio la aŭtoro de la „Essay on Trade and Commerce" respondas:

„Se oni konsideras dia institucio ke la sepa tago de la semajno estas festata, tiam tio inkludas ke la ceteraj semajntagoj apartenas al la laboro" (li celas: al la kapitalo, kiel ni tuj vidos), „kaj trudi tiun ordonon de Dio oni ne povas trakti kiel kruelaĵon … Ke la homaro ĝenerale laŭ la naturo tendencas al komfortemo kaj inerto, pri tio ni faras la fatalan sperton en la konduto de nia manufakturplebo, kiu mezume ne laboras pli ol 4 tagojn semajne, krom en la kazo de kariĝo de la vivrimedoj … Ni supozu ke buŝelo da tritiko reprezentu ĉiujn vivrimedojn de la laboristo, ke ĝi kostas 5 ŝ., kaj ke la laboristo gajnas unu ŝilingon tage per sia laboro. Tiam li bezonas labori nur 5 tagojn en la semajno; nur 4, se la buŝelo kostas 4 ŝ. … Sed ĉar la salajro en tiu ĉi reĝlando estas multe pli alta kompare kun la prezo de la vivrimedoj, la manufakturlaboristo, kiu laboras dum 4 tagoj, posedas monkromaĵon per kiu li senlabore vivas dum la resto de la semajno … Mi esperas ke mi diris sufiĉe por klarigi ke modera laboro dum 6 tagoj en la semajno ne estas sklavismo. Niaj kampkulturaj laboristoj faras tion kaj ŝajnas ke ili estas la plej feliĉaj inter la laboristoj (labouring poor)[167] sed la holandanoj faras ĝin en la manufakturoj kaj ŝajnas esti tre feliĉa popolo. La francoj faras ĝin, se ne intervenas la multaj festotagoj[168] … Sed nia plebo metis al si en la kapon la ideon ke ili kiel angloj havas per naskiĝa rajto la privilegion esti pli liberaj kaj pli sendependaj ol" (la laborista popolo) „en iu ajn alia lando de Eŭropo. Nu, tiu ideo, tiom kiom ĝi efikas sur la braveco de niaj soldatoj, povas esti iom utila; sed ju malpli la manufakturlaboristoj havas da ĝi, des pli bone por ili kaj por la ŝtato. Laboristoj neniam konsideru sin sendependaj de siaj superuloj (independent of their superiors) … Estas eksterordinare danĝere kuraĝigi kanajlarojn en komerca ŝtato kiel la nia, kie eble 7 partoj el la 8 de la tuta loĝantaro estas homoj kun malmulte aŭ neniom da proprieto[169] La kuracado ne estos kompleta ĝis kiam niaj industriaj malriĉuloj kontentiĝas labori dum 6 tagoj por la sama sumo kiun ili nun gajnas en 4 tagoj."[170]

---

166 Postlethwayt, l.c., „First Preliminary Discourse", p. 14.

167 „An Essay etc." Li mem rakontas, p. 96, en kio konsistis jam 1770 „la feliĉo" e la anglaj kampulturaj laboristoj. „Iliaj laborfortoj (their working powers) estas ĉiam plej streĉitaj (on the strech); ili ne povas vivi pli malbone ol ili faras (they cannot live cheaper than they do), nek labori pli streĉe (nor work harder)."

168 La protestantismo ludas jam per sia transformado de preskaŭ ĉiuj tradiciaj festotagoj en labortagojn gravan rolon en la genezo de la kapitalo.

169 „An Essay etc.", p. 41, 96, 97, 55, 56, 57.

Por tiu celo, kiel por „elradikigo de la pigrumado, diboĉado kaj romantikaj liberec-fantazioj”, same „por malpliigo de la imposto por malriĉuloj, stimulado de la spirito de industrio kaj malaltigo de la laborprezo en la manufakturoj”, nia fidelulo[171] de la kapitalo proponas la elprovitan rimedon, enfermi tiujn laboristojn, kiuj dependas de publika karitato, do la malriĉulojn, en „idealan azilon” (an ideal Workhouse). „Tia domo devas esti domo de teroro (House of Terror) kaj ne azilo por la malriĉuloj kie ili ricevas abunde por manĝi, devas esti varme kaj dece vestitaj kaj kie ili nur malmulte laboras.”[172] En tiu „domo de teroro”, tiu „ideala labordomo, la malriĉuloj devos labori 14 horojn tage, kun taŭga tempo por manĝoj, tiel ke restos 12 horoj da neta laboro.”[173]

Dek du laborhoroj tage en la „ideala labordomo”, en la domo de teroro de 1770! Sesdek tri jarojn poste, 1833, kiam la angla parlamento malaltigis en kvar fabrikbranĉoj la labortagon por infanoj de 13 ĝis 18 jaroj al 12 plenaj laborhoroj, ŝajnis ke venis la tago de pereo por la angla industrio! 1852, kiam Louis Bonaparte, por akiri la subtenon de la burĝaro, volis tuŝi la leĝan labortagon, la franca laborista loĝantaro kriis unuvoĉe: „La leĝo kiu reduktas la labortagon al dek du horoj estas la sola havaĵo kiu restis al ni de la leĝaro de la Respubliko!”[174] En Zuriko la laboro de infanoj pli ol 10-jaraj estas limigita al 12 horoj; en Argovio 1862 la laboro

170 l.c., p. 69. Jacob Vanderlint deklaris jam en 1734, ke la tuta sekreto de la kapitalista plendo pri la pigreco de la laborista popolo havas nur la motivon ke ili postulas por la sama salajro 6 anstataŭ 4 labortagojn.

171 En la originalo: „nia fidela Eckhart”, laŭ germana mita persono fidele helpema. -vl

172 „An Essay etc.”, p. 242, 243: „Such ideal workhouse must be made a 'House of Terror', kaj ne azilo …”

173 „In this 'House of Terror', this 'ideal workhouse', the poor shall work 14 hours in a day, allowing proper time for meals, in such manner that there shall remain 12 hours of neat-labour.” sl. „La francoj”, diras li, „ridas pri niaj entuziasmaj ideoj pri libereco. l.c., p. 78.

174 „Ili kontraŭstaris al laboro de pli ol la 12 horoj tage speciale pro tio ke la leĝo, kiu fiksis tiun hornombron, estas la sola havaĵo kiu restas al ili de la leĝaro de la Respubliko.” („Rep. of Insp. of Fact. 31st Octob. 1855”, . 80) La franca leĝo de dek du horoj de la 5-a de septembro 1850, burĝigita eldono de la dekreto de la provizora registaro de la 2-a de marto 1848, etendiĝas sendistinge al ĉiuj laborejoj. Antaŭ tiu leĝo la labortago estis senlima en Francio. Ĝi daŭris en la fabrikoj 14, 15 kaj pli da horoj. Vidu „Des classes ouvrières en France, pendant l'année 1848. Par M. Blanqui”. S-ro Blanqui, la ekonomikisto, ne la revoluciulo, estis taskita de la registaro enketi pri la laboristaj kondiĉoj.

de infanoj inter 13 kaj 16 jaroj estis reduktita de $12^1/_2$ horoj al dek du; en Aŭstrio 1860 por infanoj inter 14 kaj 16 jaroj same al 12 horoj.[175] Kia „progreso ekde 1770", triumfus Macaulay „kun ĝojego"!

La „domo de teroro" por malriĉuloj, pri kiu la kapitalanimo revis ankoraŭ 1770, leviĝis malmultajn jarojn poste kiel giganta „labordomo" por la manufakturlaboristoj mem. Ĝi nomiĝis fabriko. Kaj ĉi-foje la idealo paliĝis antaŭ la realo.

## 6. La batalo pri norma labortago. Leĝa limigo de la labortempo. La angla fabrikleĝaro de 1833-1864

Post kiam la kapitalo bezonis jarcentojn por longigi la labortagon ĝis ĝiaj normalaj maksimumaj limoj kaj poste trans tiuj, ĝis la limoj de la natura tago de 12 horoj[176], nun okazis, ekde la naskiĝo de la granda industrio en la lasta triono de la 18-a jarcento, violenta trudiĝo lavange intensa kaj senmezura. Ĉia limo de moralo kaj naturo, aĝo kaj sekso, tago kaj nokto, estis frakasita. Eĉ la nocioj de tago kaj nokto, kampule simplaj en ĉiuj malnovaj statutoj, tiom nebuliĝis ke angla juĝisto ankoraŭ en 1860

175 Belgio pruviĝis ankaŭ koncerne la reguladon de la labortago kiel burĝa modelŝtato. Lord Howard de Walden, angla plenrajtigito en Bruselo, raportas al la Ministrejo pri Eksterlandaj Aferoj la 12-an de majo 1862: „La ministro Rogier klarigis al mi ke nek ĝenerala leĝo nek lokaj reguladoj iel limigas la infanlaboron; ke la registaro dum la lastaj tri jaroj dum ĉiu sesio intencis prezenti al la Ĉambroj leĝon pri tiu temo, sed ke ĝi ĉiufoje trafis sur nesuperebla malhelpo pro la ĵaluza timo kontraŭ ia ajn leĝo en kontraŭdiro kun la principo de perfekta libereco de la laboro"! *Aldono de la franca eldono:* „La tiel nomataj «belgaj socialistoj» ripetas nur, en konfuza formo, tiun instrukcion donitan de ilia burĝaro!"

176 „Estas certe tre bedaŭrinde ke ia klaso de personoj devas laboregi dum 12 horoj tage. Se oni enkalkulas la manĝojn kaj la tempon por iri al kaj de la laborejo, tiam sumiĝas efektive 14 el la 24 taghoroj … Sen konsideri la sanon, neniu, mi esperas, hezitos koncedi ke el morala vidpunkto tiom kompleta sorbado de la tempo de la laborantaj klasoj, senĉesa, de la frua aĝo de 13 jaroj, kaj en la «liberaj» industribranĉoj eĉ de pli frua aĝo, estas eksterordinare malutila kaj terura malbonaĵo … En la intereso de la publika moralo, por edukado de aktiva loĝantaro, kaj por ebligi al la granda amaso de la popolo decan vivĝuon, oni devas insisti pri tio ke en ĉiuj komercaj branĉoj parto de la labortago estu rezervita por ripozo kaj libertempo." (Leonard Horner en „Reports of Insp. of Fact. 31st Dec. 1841)

devis klopodi per talmudeca sagaco por „verdiktvalore” klarigi kio estas tago kaj nokto.[177] La kapitalo diboĉis en siaspeca orgio.

Ekde kiam la laborista klaso, unue surdigita de la bruo de produktado iomete rekonsciiĝis, ĝi komencis sian rezistadon, unue en la naskiĝlando de la granda industrio, en Anglio. Dum tri jardekoj tamen la koncedoj truditaj de ĝi restis nur nominalaj. La parlamento decidis kvin labor-aktojn de 1802 ĝis 1833, sed estis sufiĉe ruza ne voĉdoni pri eĉ cendo[178] por ilia deviga plenumado, por la necesa oficista personaro ktp.[179] Ili restis sen ia ajn efiko.

> „La fakto estas, ke antaŭ la leĝo de 1833 infanoj kaj junuloj estis ekscese laborigataj (were worked) la tutan nokton, la tutan tagon, tage kaj nokte laŭplaĉe.”[180]

Nur ekde la fabrikleĝo de 1833 – kiu entenis koton-, lan-, lin- kaj silk-fabrikojn – ekzistas por la moderna industrio normala labortago. Nenio karakterizas la spiriton de la kapitalo pli bone ol la historio de la angla fabrikleĝaro de 1833 ĝis 1864!

La leĝo de 1833 deklaras

> „ke la ordinara fabrik-labortago komenciĝu je la 6-a horo matene kaj finiĝu je la 8-a kaj duono vespere, kaj ene de tiuj limoj, en periodo de 15 horoj, estu laŭleĝe laborigi junajn personojn (t.e. personoj inter 13 kaj 18 jaroj) je ia ajn tempo de la tago, ĉiam kondiĉe ke unu sama persono ne laboru pli ol 12 horojn ene de la tago, kun escepto de certaj speciale nomitaj kazoj.”

La 6-a sekcio de la leĝo disponas

> „ke dum ĉiu tago ĉiu tia persono de limigita labortempo devas ricevi

177 Vidu „Judgment of Mr. J. H. Otway, Belfast, Hilary Sessions, Couty Antrim 1860”.

178 *En la originalo:* pfenigo. -vl

179 Tio estas tre karakteriza por la reĝimo de Louis-Philippe, de la „burĝa reĝo”, ke la fabrikleĝo de la 22-a de marto 1841, la sola decidita sub lia regado, estis neniam obeata. Kaj tiu leĝo koncernas nur la infanlaboron. Ĝi fiksas 8 horojn por infanoj inter 8 kaj 12, dek du horojn por infanoj inter 12 kaj 16 jaroj, ktp, kun multaj esceptoj, kiuj permesas noktlaboron eĉ por okjaruloj. En lando, kie ĉiu muso estas police administrata, la kontrolado kaj trudado de tiu leĝo estis konfidita al la bona volo „de la amikoj de la komerco”. Nur ekde 1853 ekzistas en unu sola departemento, la departemento Nordo, pagata registara inspektisto. Ne malpli tipa por la evoluo de la franca socio entute estas, ke la leĝo de Louis-Philippe ĝis la revolucio de 1848 restis sola kaj unika en la ĉion envolvanta franca leĝfabriko!

180 „Rep. of Insp. of Fact. 30th April 1860”, p. 50.

minimume unu horon kaj duonon por manĝoj”.

La laborigo de infanoj malpli ol 9-jaraj, kun poste menciita escepto, estis malpermesata, la laboro de infanoj de 9 ĝis 13 jaroj limigita al 8 horoj tage. Noktlaboro, t.e. laŭ tiu leĝo, laboro inter la 8-a kaj duono vespere kaj la 5-a kaj duono matene, estis malpermesata por ĉiuj personoj inter 9 kaj 18 jaroj.

La leĝdonantoj estis tiom malemaj tuŝi la liberecon de la kapitalo elsuĉi la plenkreskulan laborforton aŭ, kiel ili nomis tion, „la liberecon de laboro”, ke ili elkovis propran sistemon por antaŭmalhelpi tian harstarigan konsekvencon de la fabrikleĝo.

> „La granda malbono de la fabriksistemo, kia ĝi estas nun organizita”, diras la unua raporto de la Centra Konsilantaro de la Komisiono de la 25-a de junio 1833, „konsistas en tio, ke ĝi kreas la neceson etendi la infanlaboron ĝis la plej ekstrema longeco de la labortago de la plenkreskuloj. La sola kuracilo por tiu malbono, sen limigo de la laboro de la plenkreskuloj, kiu, laŭ ni, kreus malbonaĵon pli grandan ol tiu kuracota, ŝajnas esti la plano laborigi duoblajn vicojn de infanoj.”

Tiu „plano” estis do realigita sub la nomo relajsosistemo („System of Relays”; relajso signifas en la angla kiel en la franca: la ŝanĝon de poŝtaj ĉevaloj ĉe la diversaj stacioj), tiel ke ekz-e de la 5-a kaj duono matene ĝis la 1-a kaj duono posttagmeze unu vico de infanoj inter 9 kaj 13 jaroj, de la 1-a kaj duono posttagmeze ĝis la 8-a kaj duono vespere alia vico estis laborigata ktp.

Kiel rekompenco por tio ke la sinjoroj fabrikistoj plej impertinente ignoris ĉiujn leĝojn pri infanlaboro dekretitajn en la lastaj 22 jaroj, oni nun orumis por ili la amaran pilolon. La parlamento disponis ke post la 1-a de marto 1834 neniu infano sub 11 jaroj, post la 1-a de marto 1835 neniu infano sub 12 jaroj kaj post la 1-a de marto 1836 neniu infano sub 13 jaroj devas labori pli ol 8 horojn en fabriko! Tiu „liberalismo” tiom domaĝa por la „kapitalo” estis tiom pli aprezinda, ĉar d-ro Farre, Sir A. Carlisle, Sir B. Brodie, Sir C. Bell, Mr. Guthrie ktp, mallonge la plej gravaj kuracistoj kaj ĥirurgoj de Londono estis deklarintaj en siaj atestoj antaŭ la deputita ĉambro, ke ĉia prokrasto estas danĝero, „periculum in mora”! D-ro Farre esprimis sin ankoraŭ iomete pli krude:

„Leĝdonado estas same necesa por antaŭmalhelpi la morton en ĉiaj formoj, en kiu ĝi antaŭtempe trudeblas, kaj certe tiu ĉi (la fabrika metodo) estas konsiderenda kiel unu el la plej kruelaj metodoj trudi ĝin.”[181]

181 „Legislation is equally necessary for the prevention of death, in any form in

La sama „reformita” parlamento, kiu pro delikateco por la s-roj fabrikistoj kondamnis infanojn malpli ol 13-jarajn por ankoraŭ longaj jaroj al la fabrika infero, aliflanke malpermesis dekomence en la leĝo pri emancipado, kiu donis ankaŭ la liberecon pogute, al la plantistoj laborigi ian ajn nigrulan sklavon pli longe ol 45 horojn semajne!

Sed la kapitalo, tute ne kontenta pri ĉiuj ĉi koncedoj, komencis tiam plurjaran kaj bruan agitadon. Tiu temis ĉefe pri la aĝo de la kategorioj kiuj sub la nomo infanoj estis limigitaj al 8-hora laboro kaj submetitaj al certa devigo iri al lernejo. Laŭ la kapitalisma antropologio la infanaĝo ĉesis en la 10-a aŭ, plej malfrue en la 11-a vivjaro. Ju pli la dato de plena aplikado de la fabrikleĝo proksimiĝis – nome en la fatala jaro 1836 – des pli furiozis la fabrikistaro. Ĝi efektive sukcesis timigi la registaron tiom ke ĝi proponis en la jaro 1835 malaltigi la finon de infanaĝo de 13 al 12 jaroj. Sed la ekstera premo minace kreskis. La kuraĝo svenis al la deputita ĉambro. Ĝi rifuzis ĵeti dektrijarulojn pli longe ol 8 horojn tage en la kapitalisman muelradon[182], kaj la leĝo de 1833 plene ekvalidis. Ĝi restis senŝanĝa ĝis junio 1844.

Dum la jardeko, en kiu ĝi regulis unue parte, poste komplete, la fabriklaboron, en la oficialaj raportoj de la fabrikinspektistoj svarmas la plendoj pri la neeblo apliki ĝin. Ĉar la leĝo de 1833 lasis al la decido de la kapital-sinjoroj, ene de la dekkvinhora periodo de la 5-a matene ĝis la 8-a kaj duono vespere, komenci, interrompi, fini la laboron de kia ajn „juna persono” kaj de ĉia „infano” la dekdu- respektive ok-horan laboron, kaj same decidi por la diversaj personoj diversajn manĝhorojn, la sinjoroj baldaŭ eltrovis novan „relajsan sistemon”, laŭ kiu la laborĉevaloj ne estu ŝanĝataj ĉe certaj stacioj, sed ĉe ŝanĝiĝantaj stacioj ili estis ĉiam denove jugataj. Ni ne haltos pli longe ĉe la beleco de tiu sistemo, ĉar ni devos poste reveni al ĝi. Sed jam nun klaras ĉe la unua vido, ke ĝi nuligis la tutan fabrikleĝon ne nur laŭ ĝia spirito, sed ankaŭ laŭlitere. Kiel ĉe tiom komplika librotenado pri ĉiu unuopa infano kaj ĉiu junulo la fabrikinspektistoj povintus trudi la leĝe fiksitajn labortempon kaj manĝojn? En granda parto de la fabrikoj la malnovaj brutalaj metodoj baldaŭ ree floris senpune. En kunveno kun la ministro pri internaj aferoj (1844) la fabrikinspektistoj pruvis la neeblon de ĉia kontrolo sub la nove elkovita relajsosistemo.[183] Sed intertempe la cirkonstancoj tre ŝanĝiĝis. La fabrik-

which it can be prematurely inflicted, and certainly this must be viewed as e most cruel mode of inflicting it.”

182*En la originalo:* „… en la Juggernaud-radon de la kapitalo” -vl

183„Rep. of Insp. of Fact. 31st October 1849”, p. 6

laboristoj, speciale ekde 1838, faris la dekhorleĝon sia ekonomia, kiel ili faris la Ĉarton sia politika aliĝ-alvoko[184]. Parto de la fabrikistoj mem, kiu estis organizintaj la fabrikreĝimon laŭ la leĝo de 1833, superŝutis la parlamenton per memoraĵoj pri la malmorala „konkurenco” de la „falsaj fratoj”, al kiuj pli granda impertinento aŭ pli favoraj lokaj cirkonstancoj ebligis la leĝrompon. Krome, kiom ajn la individua fabrikisto emis senbride kontentigi la denaskan rabavidon, la ĉefaj reprezentantoj kaj politikaj gvidantoj de la fabrikista klaso donis al tiu la instrukcion ŝanĝi la sintenon kaj la lingvon fronte al la laboristoj. Ili estis komencintaj la kampanjon por nuligo de la grenleĝoj kaj bezonis la laboristojn por venki! Ili do promesis ne nur duobligon de la porcion da pano, sed ankaŭ akcepton de la dekhorleĝo sub la miljara regno de Liberkomerco.[185] Ili devis do des malpli batali kontraŭ dispono kiu nur realigu la leĝon de 1833. Minacataj en sia plej sankta intereso, la grundrento, la aristokratoj[186] furiozis kun homama indigno kontraŭ la „kanajlaj praktikoj”[187] de siaj malamikoj.

Tiel estiĝis la aldona fabrikleĝo de la 7-a de junio 1844. Ĝi ekvalidis la 10-an de septembro 1844. Ĝi grupigas novan kategorion de laboristoj sub la protektatajn, nome la virinojn pli ol 18-jaraj. Ili estis ĉiurilate samigitaj kun la junuloj, ilia laborhoro limigita al 12 horoj, noktlaboro malpermesita ktp. Por la unua fojo la leĝdonantoj vidis sin do devigataj kontroli ankaŭ la laboron de plenkreskuloj rekte kaj oficiale. En la fabrikraporto de 1844/1845 legeblas ironie:

> „Neniu kazo venis al nia kono, kie plenkreskaj virinoj plendis pri tiu enmiksiĝo en siaj rajtoj.”[188]

La laboro de infanoj sub 13 jaroj estis reduktita al 6¹/₂ horoj kaj, sub certaj kondiĉoj, al 7 horoj tage.[189]

Por forigi la misuzoj de la falsa „relajsosistemo”, la leĝo faris interalie jenajn gravajn detalajn disponojn:

184 *En la originalo:* elekt-alvoko; *en la franca eldono:* aliĝ-alvoko; *en la angla eldono:* elekt-alvoko. -vl

185 „Rep. of Insp. of Fact. 31st October 1848”, p. 98.

186 *En la originalo:* „la Tories”, *en la franca eldono:* „la aristokratoj”. -vl

187 Cetere Leonard Horner uzas la esprimon „nefarious practices” oficiale. („Reports of Insp. of Fact. 31st October 1859”, p. 7.

188 „Rep. etc. for 30th Sept. 1844”, p. 15.

189 La leĝo permesas laborigi infanojn dum 10 horoj, se ili laboras ne tagon post tago, sed nur unu tagon trans la alia. Ĝenerale tiu klaŭzo restis senefika.

„La labortago por infanoj kaj junuloj kalkulendas ekde la tempo en kiu ia infano aŭ junulo matene eklaboras en la fabriko.”

Tiel ke, se A ekz-e eklaboras je la 8-a matene kaj B je la 10-a, la labortago devas tamen por B finiĝi je la sama horo kiel por A. La komenco de la labortago devas esti indikata per publika horloĝo, ekz-e la plej proksima fervoja horloĝo, laŭ kiu la fabriksonorilo devas esti reguligita. La fabrikisto devas pendigi grande presitan noton en la fabriko, en kiu la komenco, fino, paŭzoj de la labortagoj estas indikitaj. Infanoj, kiuj eklaboras antaŭtagmeze antaŭ la 12-a horo, devas ne esti relaborigataj post la 1-a horo posttagmeze. La posttagmeza vico devas do konsisti el aliaj infanoj ol la antaŭtagmeza vico. La $1^1/_2$ horoj por manĝo devas esti konceditaj al ĉiuj protektataj laboristoj en la samaj periodoj de la tago, almenaŭ unu horon antaŭ la 3-a posttagmeze. Infanoj aŭ junuloj devas ne esti laborigataj pli longe ol 5 horojn antaŭ la 1-a horo posttagmeze sen almenaŭ duonhora manĝopaŭzo. Infanoj, junuloj aŭ virinoj ne rajtas dum ia ajn manĝo resti en fabriksalono en kiu okazas ia ajn laborprocezo ktp.

Oni vidis: Tiuj detalegaj disponoj kiuj reguligas la periodon, limojn, paŭzojn, tute ne estis produktoj de parlamenta fantazio. Ili iom post iom evoluis el la kondiĉoj, kiel naturleĝoj de la moderna produktadmaniero. Ilia formulado, oficiala agnosko kaj ŝtata proklamo estis la rezulto de longaj kaj komplikaj klasbataloj. Unu el iliaj unuaj sekvoj estis ke la praktiko submetis ankaŭ la plenkreskajn virajn fabriklaboristojn al la samaj limoj, ĉar en la plej multaj produktadprocezoj la kunlaborado de infanoj, junuloj kaj virinoj estis nemalhavebla. Do, dum la periodo de 1844 ĝis 1847 la dekduhora labortago validis ĝenerale kaj unuece en ĉiuj industribranĉoj submetitaj al la fabrikleĝaro.

La fabrikistoj permesis tiun „progreson” tamen ne sen kompensan „malprogreson”. Laŭ ilia instigo la deputita ĉambro reduktis la minimuman aĝon de la laborigeblaj infanoj de 9 jaroj al 8, por certigi al la kapitalo la „kroman infanprovizon” laŭ Dia kaj homa leĝo.[190]

La jaroj 1846 kaj 1847 estas epokfaraj en la ekonomia historio de Anglio. Nuligo de la grenleĝoj, forigo de la import-doganaĵoj por kotono kaj aliaj krudmaterialoj, la liberkomerco deklarita gvida principo de la leĝdonado! Mallonge, la miljara regno komenciĝis. Aliflanke en la samaj jaroj la ĉartista movado kaj la agitado por la dekhortago kulminis. Ili trovis aliancanojn en la venĝavida aristokrataro. Spite al la fanatika

190„Ĉar malaltigo de ilia labortempo kondukus al dungo de granda nombro” (da infanoj) „oni pensis ke la kroma provizo de infanoj en aĝo de 8 kaj 9 jaroj kovrus la kroman postulon.” (l.c. p. 13)

rezistado de la armeo de promesrompaj liberkomercistoj, kun Bright kaj Cobden ĉe sia pinto, la tiom longe alstrebita dekhorleĝo trairis la parlamenton.

La nova fabrikleĝo de la 8-a de junio 1847 disponis ke la 1-an de julio de la sama jaro la labortago estu provizore limigita al 11 horoj por „junuloj" (de 13 ĝis 18), kaj ĉiuj virinoj, sed ke la 1-an de majo 1848 ekvalidu la definitiva limigo al 10 horoj. Cetere la leĝo estis nur amenda aldono al la leĝoj de 1833 kaj 1844.

La kapitalo entreprenis provizoran kampanjon por malebligi la plenumadon de la leĝo je la 1-a de majo 1848. Kaj pli precize, la laboristoj mem, laŭdire saĝiĝintaj per sia propra sperto, devis helpi detrui sian propran kreitaĵon. La momento estis lerte elektita.

> „Oni devas memori ke pro la terura krizo de 1846-1847 granda sufero regis inter la fabriklaboristoj, ĉar multaj fabrikoj laboris nur mallongan tempon, aliaj estis komplete haltigitaj. Konsiderinda nombro da laboristoj troviĝis do en plej prema situacio, multaj en ŝuldoj. Oni povis do kun sufiĉa certeco supozi ke ili preferus la pli longan labortempon por kompensi la pasintajn perdojn, eble repagi ŝuldojn aŭ repreni siajn meblojn el la lombardejo aŭ anstataŭigi venditajn havaĵojn aŭ akiri novajn vestaĵojn por si mem kaj por siaj familioj."[191]

La sinjoroj fabrikistoj provis pliigi la naturan efikon de tiuj cirkonstancoj per ĝenerala 10-elcenta malaltigo de salajroj. Tio okazis, por tiel diri, kiel inaŭgura festo de la nova liberkomerca erao. Poste sekvis dua malaltigo je $8^{1}/_{3}$ %, ekde kiam la labortago estis reduktita al 11, kaj duoble, kiam ĝi estis definitive reduktita al 10 horoj. Do, kie ajn la kondiĉoj iel permesis tion, okazis 25-elcenta malaltigo de la salajro.[192] Sub tiaj favore preparitaj kondiĉoj oni komencis la agitadon inter la laboristoj por nuligi la leĝon de 1847. Ĉe tio oni ne rezignis pri ia ajn rimedo de trompo, de delogo kaj de minaco, sed ĉion vane. Koncerne la ses peticiojn, en kiuj la laboristoj devis plendi pri „sia subpremado fare de la leĝo", la petintoj deklaris mem, ĉe parola pridemandado, ke iliaj subskriboj estis truditaj.

191 „Rep. of Insp. of Fact. 31st Oct. 1848", p. 16.

192 „Mi trovis ke al homoj, kiuj estis ricevintaj 10 ŝ. semajne, oni deprenis 1 ŝ. pro la ĝenerala 10-elcenta malaltigo de salajroj kaj kromajn 1 ŝ. 6 d. pro la mallongigo de la tempo, sume 2 ŝ. 6 d., kaj spite al ĉio ĉi multaj el ili diris ke ili preferas labori 10 horojn." saml. [Tiel laŭ la angla versio, kiu aperigas la originalan tekston de la citaĵo, dum la franca eldono sekvas la Marksan tradukon, en kiu tekstas: „la plej multaj el ili diris …". -vl]

„Ili estas subpremataj, sed de iu alia ol de la fabrikleĝo."[193] Sed kiam la fabrikistoj ne sukcesis paroligi la laboristojn en ilia senco, tiam ili kriegis des pli laŭte en gazetaro kaj parlamento nome de la laboristoj. Ili denuncis la fabrikinspektistojn kiel specon de revoluciaj komisaroj kiel tiuj de la Franca Nacia Konvento, kiuj senkompate oferas la malfeliĉan laboriston al sia kaprico de mondplibonigistoj. Ankaŭ tiu manovro fiaskis. La fabrikinspektisto Leonard Horner propramane kaj per siaj subinspektistoj faris multnombrajn pridemandadojn de atestantoj en la fabrikoj de Lancashire. Proksimume 70 % de la pridemanditaj laboristoj deklaris sin por 10 horoj, multe malpli granda elcentaĵo por 11 kaj tute sensignifa malplimulto por la malnovaj 12 horoj.[194]

Alia manovro „per komuna akordiĝo" konsistis en tio, laborigi la virajn laboristojn dum 12 ĝis 15 horoj kaj poste deklari tiun fakton kiel plej bonan esprimon de la proletaj deziroj. Sed la „senkompata" fabrikinspektisto Leonard Horner estis ree surloke. La plej multaj „kromlaboristoj" deklaris,

> „ke ili ege preferus labori 10 horojn por malpli da salajro, sed ili ne havas elekton; tiom da ili estas senlaboraj, tiom da ŝpinistoj devigataj kiel simplaj alligantoj (piecers) ke, se ili rifuzas la pli longan labortempon, aliaj tuj okupas iliajn lokojn, tiel ke la demando por ili staras jene: aŭ labori dum la pli longa tempo aŭ maldungiĝi."[195]

La provizora kampanjo de la kapitalo fiaskis kaj la dekhorleĝo ekvalidis la 1-an de majo 1848. Sed intertempe la fiasko de la ĉartista partio, kies gvidanto estis malliberigita kaj kies organizaĵo detruita, jam ŝanceligis la memfidon de la angla laborista klaso. Baldaŭ poste la junia ribelo en Parizo kaj ĝia sanga subpremo unuigis en la kontinenta Eŭropo kiel en Anglio ĉiujn frakciojn de la regantaj klasoj, grundproprietulojn kaj kapitalistojn, borsajn lupojn kaj komercistojn , protektistojn kaj liberkomerc-

193 „Kiam mi subskribis la peticion, mi samtempe deklaris ke mi faras per tio ion malbonan. – Kial vi do subskribis ĝin? – Ĉar en kazo de mia rifuzo mi estus maldungita. – La petinto sentis sin efektive «subpremata», sed ne ĝuste de la fabrikleĝo." (l.c., p. 102)

194 l.c., p. 17. En la distrikto de s-ro Horner, tiel 10.270 plenkreskaj viraj laboristoj en 181 fabrikoj estis pridemanditaj. Iliaj deklaroj troveblas en la aldono al la fabrikraporto por la duonjaro finiĝanta en oktobro 1848. Tiuj pridemandoj de atestantoj liveras ankaŭ alirilate aprezindan materialon.

195 saml. Vidu la deklarojn kolektitajn de Leonard Horner mem n-rojn 69, 70, 71, 92, 93 kaj tiujn kolektitajn de la subinspektisto A. n-rojn 51, 52, 58, 59, 62, 70 de la „Aldono". Unu fabrikisto rakontas la plenan veron. Vd n-ron 14 kaj n-ron 265, saml.

istojn, registaron kaj opozicion, pastrojn kaj ateistojn, junajn putinojn kaj maljunajn monaĥinojn, sub la komunan alvokon al savo de la proprieto, de la religio, de la familio, de la socio! La laborista klaso estis ĉie deklarita krima, frapita de malpermesoj kaj metita sub la „leĝo de suspektuloj". La sinjoroj fabrikistoj do jam ne bezonis ĝeniĝi. Ili malkaŝe ribelis ne nur kontraŭ la dekhorleĝo, sed kontraŭ la tuta leĝaro kiu ekde 1833 provis iomete bridi la „liberan" elsuĉadon de la laborforto. Ĝi estis miniatura sklavista ribelo (Proslavery Rebellion), daŭrigata dum pli ol du jaroj kun cinika senrespektemo, kun terorisma energio, ambaŭ des pli malmultekostaj ĉar la ribela kapitalisto riskis neniom ol la haŭton de siaj laboristoj.

Por kompreni la sekvon oni devas memori ke el la tri fabrikleĝoj de 1833, 1844 kaj 1847 – ĉiuj tri jure validaj escepte kie unu amendis la alian –; neniu limigis la labortagon de vira laboristo pli ol 18-jara kaj ke ekde 1833 la dekkvinhora periodo de la 5-a kaj duono matene ĝis la 8-a kaj duono vespere restis la leĝa „tago", ene de kiu nur la dekdu-, poste la dek-hora laboro de junuloj kaj virinoj estis plenumenda sub la preskribitaj kondiĉoj.

La fabrikistoj komencis ie kaj tie maldungi parton, kelkfoje la duonon de la junuloj kaj virinoj dungitaj de ili kaj kompense restarigis la aperintan noktlaboron por la plenkreskaj viraj laboristoj. La dekhorleĝo, kriis ili, ne lasas alian alternativon al ili![196]

La dua paŝo celis la leĝajn paŭzojn por manĝoj. Ni aŭdu la fabrikinspektistojn.

> „Ekde la limigo de la laborhoroj al 10 la fabrikistoj asertas, kvankam ili praktike ankoraŭ ne realigas sian opinion ĝis la lasta konsekvenco, ke, se ili ekz-e laborigas de la 9-a horo matene ĝis la 7-a vespere, ili kontentigas la leĝajn preskribojn se ili donas unu horon por manĝo antaŭ la 9-a horo matene kaj duonan horon post la 7-a vespere, do $1^1/_2$ horojn por manĝoj. En kelkaj kazoj ili nun permesas duonan aŭ tutan horon por tagmanĝo, sed samtempe insistas pri tio ke ili tute ne estas devigataj doni ian ajn parton de la $1^1/_2$ horoj dum la dekhora labortago."[197]

La sinjoroj fabrikistoj asertas do ke la plej detalaj dispozicioj de la leĝo de 1844 pri manĝoj donas al la laboristoj nur la permeson, manĝi kaj trinki antaŭ sia eniro en la fabrikon kaj post sia eliro el la fabriko, do ĉe si hejme! Kaj kial la laboristoj ne tagmanĝu ankaŭ antaŭ la 9-a matene? Sed la reĝaj juristoj decidis ke la preskribitaj manĝoj

196 „Reports etc. for 31st October 1848", p. 133, 134.

197 „Reports etc. for 30th April 1848", p. 47.

> „estas donendaj en paŭzoj dum la reala labortago kaj ke estas kontraŭleĝe laborigi dum 10 horoj sinsekve de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere seninterrompe."[198]

Post tiuj amindaj manifestacioj la kapitalo komencis sian ribelon per paŝo kiu konformis al la litero de la leĝo de 1844, do estis laŭleĝa.

La leĝo de 1844 ja malpermesis ke infanoj de 8 ĝis 13 jaroj, kiuj estas laborigataj matene antaŭ la 12-a, estu relaborigataj post la 1-a tagmeze. Sed ĝi neniel reguligis la $6^{1}/_{2}$-horan laboron de la infanoj, kies labortempo komenciĝis je la 12-a horo tagmeze aŭ pli malfrue! Okjaraj infanoj povis do, se ili komencis la laboron je la 12-a horo tagmeze, labori de la 12-a ĝis la 1-a, 1 horon; de la 2-a ĝis la 4-a posttagmeze, 2 horojn, kaj de la 5-a ĝis la 8-a kaj duono vespere, $3^{1}/_{2}$ horojn; sume la leĝajn $6^{1}/_{2}$ horojn! Aŭ eĉ pli bone. Por adapti ilian laboron al la laboro de la plenkreskaj viraj laboristoj ĝis la 8-a kaj duono vespere, la fabrikistoj nur devis ne doni al ili laboron antaŭ la 2-a posttagmeze kaj povis tiam teni ilin seninterrompe en la fabriko ĝis la 8-a kaj duono vespere!

> „Kaj nun oni eksplicite koncedas ke en Anglio lastatempe ekzistas la praktiko, pro la fabrikista avido laborigi sian maŝinaron pli ol 10 horojn tage, laborigi ok- ĝis dektri-jarajn geinfanojn post forigo de ĉiuj junuloj kaj virinoj el la fabriko sole kun la plenkreskaj viroj ĝis la 8-a kaj duono vespere."[199]

Laboristoj kaj fabrikinspektistoj protestis pro higienaj kaj moralaj kialoj. Sed la kapitalo respondis:

> „La pezo de miaj faroj falu sur mian kapon! Mi volas mian rajton, la plenumadon de mia kontrakto kaj de ĉio kiun ĝi entenas!"

Efektive, laŭ statistika informo al la deputita ĉambro de la 26-a de julio 1850, spite al ĉiaj protestoj, la 15-an de julio 1850 3.732 infanoj en 257 fabrikoj estis submetitaj al tiu „praktiko".[200] Ankoraŭ ne sufiĉe! La linkokula kapitalo malkovris ke la leĝo de 1844 ja defendis, estas vere, laborigi pli ol kvin horojn antaŭ tagmeze sen almenaŭ tridekminuta paŭzo por refreŝiĝo, sed preskribas nenion pri la maniero de la posttagmeza laboro. Ĝi postulis kaj elpremis do la ĝuon ne nur laborigi okjarajn laboristinfanojn senĉese de la 2-a posttagmeze ĝis la 9-a vespere, sed ankaŭ malsatigi ilin!

> „La karnon mi bezonas", diris Shylock; „tiel diras la bileto."[201]

198 „Reports etc. for 31st Oct. 1848", p. 130.

199 „Reports etc.", l.c., p. 142.

200 „Reports etc. for 31th Oct. 1850", p. 5, 6.

201 *Vortumo laŭ la franca eldono:* La naturo de la kapitalo restas ĉiam la sama, en

Tiu maniero alkroĉiĝi, kiel Shylock, al la laŭlitera leĝo, kie ĝi reguligas la infanlaboron, celis nur prepari la malkaŝan ribeladon kontraŭ la sama leĝo, kie ĝi reguligas la laboron de junuloj kaj virinoj. Oni memoras ke la ĉefa celo de tiu leĝo estis la forigo de la „falsa relajso-sistemo”. La fabrikistoj komencis sian ribeladon per la simpla deklaro ke la sekcioj de la leĝo de 1844, kiuj malpermesas laŭplaĉan uzadon de junuloj kaj de virinoj dum iaj ajn mallongaj partoj de la dekkvinhora fabriktago, restis

> „relative bagatelaj (comparatively harmless) tiom longe kiom la labortempo estis limigita al 12 horoj. Sub la dekhorleĝo ili fariĝis neeltenebla maljustaĵo („grievous hardship”).”[202]

Ili indikis do al la inspektistoj plej fridsange ke ili metas sin super la leĝo kaj reenkondukas la malnovan sistemon per sia propra aŭtoritato.[203] Ke tio okazas en la intereso de la malbone konsilitaj laboristoj mem,

> „por povi pagi al ili pli altajn salajrojn”. „Ĝi estas la sole ebla plano por konservi sub la dekhorleĝo la industrian superecon de Britio.”[204] „Eble estas malfacile malkovri malregulaĵojn sub la relajsosistemo, sed kion tio signifas? (What of that?) Ĉu la granda fabrikintereso de tiu ĉi lando estu traktata kiel io duaranga por ŝpari al la fabrikinspektistoj kaj subinspektistoj iomete pli da penado (some little trouble)?”[205]

Kompreneble ĉiaj ĉi ruzaĵoj ne helpis; la fabrikinspektistoj reagis tribunale. Sed baldaŭ svarmo da fabrikistaj peticioj superŝutis la ministron pri internaj aferoj, Sir George Grey, ke li en cirkulero de la 5-a de aŭgusto 1848 instrukciis la inspektistojn,

---

siaj neevoluintaj kiel en siaj plene evoluintaj formoj. En la leĝaro kiun la influo de la sklavistoj ĵus antaŭ la eksplodo de la usona interna milito trudis al la teritorio de Nov-Meksikio, tekstas jene: la laboristo, tiom kiom la kapitalisto aĉetis lian laborforton, „estas lia [de la kapitalisto] mono.” La sama vidmaniero regis ĉe la patricioj de Romo. La mono kiun ili estis antaŭpagintaj al la pleba ŝuldanto, transformiĝis pere de liaj vivrimedoj en karnon kaj sangon de la ŝuldanto. Tiu „karno kaj sango” estis do „ilia mono”. Pro tio la leĝo de Shylock pri la 10 tabuloj! Kompreneble ni ne konsideros la hipotezon de Linguet ke la patriciaj kreditoroj de tempo al tempo organizis trans la Tibero festenojn de kuirita ŝuldantkarno, nek la hipotezon de Daumer pri la kristana eŭkaristio. [-vl]

202 „Report etc. for 31st Oct. 1848”, p. 133.

203 Tiel interalie la filantropo Ashworth en kvakere naŭza letero al Leonard Horner. „”Rep. Apr. 1849”, p. 4)

204 „Reports etc. for 31st Oct. 1848”, p. 138.

205 l.c., p 140

„ĝenerale ne interveni pro rompo de la litero de la leĝo, ĉiun fojon kiam la relajsosistemo ne estas pruvite misuzata por laborigi junulojn kaj virinojn pli ol 10 horojn”.

Sekve al tio, la fabrikinspektisto J. Stuart permesis la tiel nomatan relajsosistemon dum la dekkvinhora periodo de la fabriktago en tuta Skotlando, kie ĝi baldaŭ refloris laŭ la malnova maniero. La anglaj fabrikinspektistoj male deklaris ke la ministro ne posedas diktatoran povon suspendi la leĝojn kaj daŭrigis la tribunalan persekutadon de la porsklavismaj ribeluloj.

Sed kial venigi ilin antaŭ tribunalon, se tiu – ĉi-kaze la „county magistrates”[206] tuj deklaris ilin senkulpaj? En tiuj tribunaloj la sinjoroj fabrikistoj juĝis pri si mem. Jen ekzemplo: Iu Eskrigge, kotonŝpinisto de la firmao Kershaw, Leese kaj K-o, submetis al la fabrikinspektisto de sia distrikto la skemon de la relajsosistemo destinita por lia fabriko. Ĝi estis rifuzita, kaj li unue kondutis pasive. Malmultajn monatojn poste, individuo kun la nomo Robinson, same kotonŝpinisto, kaj de kiu la supre nomita Eskrigge estis parenco aŭ eĉ lia Vendredo[207], aperis antaŭ la „urbaj pacjuĝistoj” en Stockport, ĉar li realigis relajsoplanon precize saman kiel tiun kiun Eskrigge estis inventinta. Kvar juĝistoj deĵoris, el kiuj tri estis kotonŝpinistoj, kun ĉekape la inventema Eskrigge. Eskrigge deklaris Robinson-on senkulpa, kaj poste deklaris ke tio kio justas por Robinson estas justa ankaŭ por Eskrigge. Apogante sin sur sia propra juĝo, li tuj starigis la sistemon en sia propra fabriko.[208] Tamen jam la konsisto de tiuj tribunaloj estis malkaŝa rompo de la leĝo.[209]

„Tiaj tribunalaj farsoj”, elkrias la inspektisto Howell, „urĝe postulas ĝustigon – aŭ la leĝo estu tiel ŝanĝota ke ĝi konformiĝu al tiaj decidoj, aŭ ĝi estu administrata de malpli erarema tribunalo, kies decidoj estu konformaj al la leĝo … kiam tiaj juĝaferoj estas traktataj. Mi sopiras je pagata juĝisto!”[210]

---

206 Tiuj „county magistrates”, la „great unpaid” <„grandaj nepagatoj”> kiel W. Cobbett nomas ilin, estas speco de nepagataj pacjuĝistoj, nomumataj el inter la eminentuloj de la graflandoj kaj plenumantaj siajn funkciojn senpage.

207 Servisto, laŭ la persono en la romano „Robinsono” de Daniel Defoe. -vl

208 *„Reports, etc. for 30th April 1849”*, p. 21, 22. Kp similajn ekzemplojn, saml., p. 4, 5.

209 Per la leĝo 1 kaj 2 W[illia]m IV., c. 29, s. 10, konata kiel „Sir John Hobhouse's Factory Act”, estas malpermesate ke ia ajn posedanto de kotonŝpinejo aŭ teksejo aŭ patro, filo kaj frato de tia posedanto funkciu kiel pacjuĝisto pri demandoj kiuj koncernas la fabrikleĝon.

210 *„Reports etc. for 30th April 1849”* [p. 22].

La reĝaj juristoj deklaris absurda la interpreton kiun la fabrikistoj faris de la leĝo de 1848, sed la savistoj de la socio ne lasis sin senkuraĝigi.

> „Post kiam mi", raportas Leonard Horner, „per 10 persekutoj en 7 diversaj tribunalaj distriktoj provis trudi la leĝon kaj nur en unu kazo estis subtenata de la juĝistoj, … mi konsideris senutila plian persekutadon de malrespekto de la leĝo. Tiu parto de la leĝo ellaborita por krei unuformecon en la laborhoroj, … jam ne ekzistas en Lancashire. Krome mi kun miaj subagentoj tute ne posedas rimedon por certigi ke fabrikoj, kie regas la tiel nomata relajsosistemo, laborigas junulojn kaj virinojn ne pli ol dum 10 horoj … Fine de aprilo 1849 jam 114 fabrikoj en mia distrikto laboris laŭ tiu metodo, kaj ĝia nombro lastatempe kreskegas. Ĝenerale ili laboras nun dum 13$^{1}/_{2}$ horoj, de la 6-a horo matene ĝis la 7-a kaj duono vespere; en kelkaj okazoj 15 horojn de la 5-a kaj duono matene ĝis la 8-a kaj duono vespere."[211]

Jam en decembro 1848 Leonard Horner posedis liston de 65 fabrikistoj kaj de 29 fabrikinspektistoj, kiuj unuvoĉe deklaris, ke neniu sistemo de inspektado povas sub tiu ĉi relajsosistemo malebligi la plej ekstreman kromlaboron.[212] Jen la samaj infanoj kaj junuloj estis ŝovataj (shifted) el la ŝpinsalono en la teksadsalonon, jen, dum 15 horoj, el unu fabriko en la alian.[213] Kiel eblas kontroli sistemon,

> „kiu misuzas la vorton relajso, por intermiksi la manojn en senfina varieco kiel kartojn kaj disŝovi la horojn de laboro kaj de ripozo por la diversaj individuoj ĉiutage tiel ke unu sama kompleta „manaro" neniam laboras samtempe en la sama loko"[214]

Sed tute sendepende de la reala laboreksceso, tiu tiel nomata relajssistemo estis elkovaĵo de la kapitalfantazio, kian Fourier en siaj humuraj skizoj de la „courtes séances" neniam superis, kun la escepto ke la altiro de la laboro estis transformita en la altiron de la kapitalo. Sufiĉas rigardi tiujn skemojn liveritajn de la fabrikistoj, kiujn la „bona" gazetaro laŭdis kiel modelon de tio „kion modesta grado da zorgemo kaj da metodo povas plenumi" („what a reasonable degree of care and method can accomplish"). La laborista personaro estis ofte dividita en 12 ĝis 15 kategoriojn, kiuj siavice mem konstante ŝanĝis siajn konsistajn partojn. Dum la dekkvinhora periodo de la fabriktago la kapitalo altiris la laboriston jen por 30 minutoj, jen por horo, kaj poste repuŝis lin el la fabriko, kaj tiel pelis lin alen kaj reen en disaj tempopecoj, sen iam perdi lin el la

211 „*Reports ets. for 30th April*", p. 5.

212 „*Rep. etc. for 31th Oct. 1849*", p. 6.

213 „*Rep. etc. for 30th April 1849*", p. 21.

214 „*Rep. etc. 31th Oct. 1848*", p. 95.

okuloj nek el la manoj ĝis kiam la dekhora laboro estis plenumita. Kiel en la teatro la samaj personoj devas alterne sursceniĝi en la diversaj scenoj kaj aktoj. Sed kiel aktoro apartenas dum la tuta daŭro de la dramo al la teatro, tiel la laboristoj apartenis nun dum 15 horoj al la fabriko, ne enkalkulite la tempon por iri de kaj al ĝi. La horoj de ripozo transformiĝis tiel en horojn de trudita nenifarado, kiuj pelis la junajn virlaboristojn en la drinkejojn kaj la junajn laboristinojn en la bordelon. Ĉe ĉiu nova ideo kiun la kapitalisto elkovis por funkciigi sian maŝinaron sen pliigo de la laborista personaro dum 12 aŭ 15 horoj, la laboristo devis jen en tiu peco da temporubaĵo, jen en tiu alia, engluti sian manĝaĵon. Dum la periodo de la agitado por la dekhortago la fabrikistoj kriegis ke la laboristaĉaro peticias ĉar ĝi atendas ricevi dekduhoran salajron por dekhora laboro. Ili estis nun returnintaj la medalon. Ili pagis dekhoran salajron por dekdukaj dekkvin-hora dispono pri la laborfortoj![215] Jen la esenco de la afero, jen kiel la fabrikistoj interpretis la dekhorleĝon! Ili estis tamen la samaj pastre mildaj liberkomercistoj elŝvitantaj homamon, kiuj dum dek jaroj, dum kiuj daŭris la agitado kontraŭ la grenleĝo, ne laciĝis demonstri al la laboristoj, kalkulante per pundoj, ŝilingoj kaj pencoj, ke dek horoj da ĉiutaga laboro komplete sufiĉus por riĉigi la kapitalistojn, se nova impeto estus donita al la angla industrio per libera importado de greno.[216]

La dujara kapitalribelo estis fine kronita de la verdikto de unu el la kvar plej altaj kortumoj de Anglio, de la Kortumo de la *Exchequer*, kiu decidis en kazo portita antaŭ ĝi, la 8-an de februaro 1850, ke la fabrikistoj ja agis kontraŭ la senco de la leĝo de 1844, sed ke tiu leĝo mem entenas certajn vortojn kiuj faras ĝin sensenca. „Per tiu decido la dekhorleĝo estis nuligita."[217] Multegaj fabrikistoj, kiuj ĝis nun ankoraŭ hezitis uzi la relajsan sistemon por junuloj kaj laboristinoj, nun kaptis la okazon per ambaŭ

215 Vd *„Reports etc. for 30th April 1849"*, p. 6, kaj la detalan klarigon de la „shifting system" <"laborskipa sistemo"> fare de la fabrikinspektistoj Howell kaj Saunders en *„Reports etc. for 31st Oct. 1848"*. Vd ankaŭ la peticion de la pastraro de Ashton kaj ĉirkaŭaĵo, printempe de 1849, al la reĝino, kontraŭ la „shift system".

216 Kp ekz-e *„The Factory Question and the Ten Hours Bill"*, de R. H. Greg, 1837.

217 F. Engels, *„Die englische Zehnstundenbill"* [F. Engelso: „La angla dekhorleĝo"] (en la *„Neue Rh. Zeitung. Politisch-ökonomische Revue"*, aprila kajero 1850, p. 13 <vd vol. 7, p. 240>). La sama „alta" kortumo malkovris ankaŭ dum la usona interna milito ambiguecon de vorto kiu ŝanĝas la leĝon kontraŭ ekipado de pirataj ŝipoj en ĝian rektan malon.

manoj.[218]

Sed kun tiu ŝajne definitiva venko okazis tuja reago. La laboristoj faris ĝis nun pasivan, kvankam nefleksiĝeman kaj ĉiutage rean rezistadon. Ili protestis nun en laŭte minacaj publikaj kunvenoj en Lancashire kaj Yorkshire. La laŭdira dekhorloĝo estas do nura blago, parlamenta trompo, kaj neniam ekzistis! La fabrikinspektistoj urĝe avertis la registaron, ke la klasa antagonismo estas streĉita en nekredebla grado. Parto de la fabrikistoj mem grumblis:

> „Pro la kontraŭdiraj decidoj de la juĝistoj regas tute malnormala kaj anarĥia situacio. Iu leĝo validas en Yorkshire, alia en Lancashire, ankoraŭ alia leĝo en pastrejo de Lancashire, alia en ties rekta najbareco. La fabrikisto en grandaj urboj povas ĉirkaŭiri la leĝon, tiu en kamparaj regionoj ne trovas la necesan personaron por la relajsosistemo kaj eĉ malpli por ŝovi la laboristojn el unu fabriko en la alian, ktp."

Kaj sama ekspluatado de la laborforto estas la unua homrajto de la kapitalo.

En tiuj kondiĉoj okazis kompromiso inter fabrikistoj kaj laboristoj, parlamente sigelita per la nova aldona fabrikleĝo de la 5-a de aŭgusto 1850. Por „junuloj kaj virinoj" la labortago estis altigita en la unuaj 5 semajntagoj de 10 al 10½ horoj, por sabato limigita al 7½ horoj. La laboro devas okazi en la periodo de la 6-a horo matene ĝis la 6-a vespere[219], kun paŭzoj de unu horo kaj duono por manĝoj, kiuj estas donendaj samtempe kaj laŭ la dispozicioj de 1844, ktp. Per tio la relajsosistemo estis forigita unu fojon por ĉiam.[220] Por infanlaboro la leĝo de 1844 restis valida.

Unu kategorio de fabrikistoj certigis al si, kiel antaŭe, apartajn sinjorajn privilegiojn je proletaj infanoj. Tiuj estis la silkfabrikistoj. En la jaro 1833 ili minace hurlis ke „se oni forprenus al ili la liberecon laborigi infanojn de ĉia aĝo dum 10 horoj, oni haltigus iliajn fabrikojn" („if the liberty of working children of any age for 10 hours a day was taken away, it would stop their works") Ke ili ne povas aĉeti sufiĉan kvanton da infanoj pli ol 13-jaraj. Ili elĉantaĝis la deziratan privilegion. La preteksto, ĉe posta

218 *„Rep. etc. for 30th April 1850"*.

219 Dumvintre la periodo povas esti inter la 7-a matene kaj la 7-a vespere.

220 „La nuna leĝo" (de 1850) „estis kompromiso, ĉe kiu la laboristoj rezignis je la beno de la dekhorleĝo por la avantaĝo de unueca laborkomenco kaj laborfino de tiuj kies labortempo estas submetita al limoj." (*„Reports etc. for 30th April 1852"*, p. 14)

esplorado, montriĝis simpla mensogo[221], kio tamen ne malhelpis ilin, dum dek jaroj, ŝpini silkon ĉiutage dum dek horoj per la sango de infanoj tiom etaj ke oni devis meti ilin sur altajn seĝojn dum la tuta daŭro de ilia laboro.[222] La leĝo de 1844 ja „rabis" al ili la „liberecon" laborigi infanojn sub la aĝo de 11 jaroj pli longe ol 6½ horoj, sed aliflanke certigis al ili la privilegion laborigi infanojn de inter 11 kaj 13 jaroj 10 horojn tage, kaj nuligis la devigon sendi ilin al lernejo, preskribitan por aliaj fabrikinfanoj. Jen ĉi-foje la preteksto:

> „La delikateco de la tolo postulas fingran delikatecon kiu certigeblas nur per frua eniro en la fabrikon."[223]

Pro la delikataj fingroj oni buĉis la infanojn komplete, kiel kornbrutoj en suda Ruslando pro haŭto kaj sebo. Fine, en 1850, la privilegio koncedita en 1844 estis limigita al la fakoj de silktvirnado kaj silkbobenado, sed ĉi tie, kiel kompensaĵo por la kapitalo prirabita je sia „libereco", la labortempo por infanoj de 11- ĝis 13-jaraj estis altigita de 10 al 10½ horoj. Preteksto: „La laboro estas pli facila en silkfabrikoj ol en aliaj fabrikoj kaj neniel tiom malutila al la sano."[224] Oficiala kuracista esplorado pruvis poste, ke inverse

> „la mezuma mortkvoto en la silkdistriktoj estas eksterordinare alta kaj inter la virina parto de la loĝantaro eĉ pli alta ol en la kotondistriktoj de Lancashire".[225]

Malgraŭ la protestoj de la fabrikinspektistoj, ripetataj ĉiun duonjaron, la privilegio daŭras ĝis nun.[226]

---

221 *„Reports etc. for 30th Sept. 1844"*, p. 13.

222 saml.

223 „The delicate texture of the fabric in which they were employed requiring a lightness of touch, only to be acquired by their early introduction to these factories." (*„Rep. etc. for 31st Oct. 1846"*, p. 20)

224 *„Reports etc. for 31st Oct. 1861"*, p. 26.

225 l.c., p. 27. Ĝenerale la laborista loĝantaro submetita al la fabrikleĝo korpe tre pliboniĝis. Ĉiuj kuracistaj atestoj pri tio interkonsentas kaj propra persona rigardo je diversaj periodoj konvinkis min pri tio. Tamen, kaj sendepende de la terura mortkvoto de infanoj en la unuaj vivjaroj, la oficialaj raportoj de D-ro Greenhow montras la malbonan sanstaton de la fabrikdistriktoj, kompare kun la „kampkulturaj distriktoj kun normala sano". Kiel pruvo servu i.a. la jena tabelo el lia raporto de 1861 [en la sekva paĝo -vl].

226 Oni scias, kiom kontraŭvole la anglaj „liberkomercistoj" rezignis pri la protekta doganaĵo por silkmanufakturo. Anstataŭ la protekto kontraŭ franca importaĵo nun servas la senprotekteco de anglaj fabrikinfanoj.

La leĝo de 1850 transformis nur por „junuloj kaj virinoj” la dekkvin-horan periodon de la 5-a kaj duono matene ĝis la oka kaj duono vespere en la dekduhoran periodon de la 6-a matene ĝis la 6-a vespere. Do ne por infanoj, kiuj daŭre restis ekspluateblaj duonan horon antaŭ la komenco kaj $2^{1}/_{2}$ horojn post la fino de tiu periodo, eĉ se la suma daŭro de ilia laboro devis ne superi $6^{1}/_{2}$ horojn. Dum la diskutado de tiu leĝo la fabrik-inspektistoj submetis al la parlamento statistikon pri la fiaj misuzoj de tiu malnormalaĵo. Sed vane. En la fono insidis la intenco, en prosperaj jaroj relongigi la labortagon de la plenkreskaj laboristoj kun la helpo de la infanoj al 15 horoj. La sperto de la sekvaj 3 jaroj montris, ke tia provo devas fiaski pro la rezistado de la plenkreskaj

***Tabelo de D-ro Greenhow el lia raporto de 1861***

| **Elcentaĵo de plenkreskaj viroj laborantaj en la manufakturo** | **Mortokvoto de pulmo malsanoj por po 100.000 viroj** | **Nomo de la distriktoj** | **Mortokvoto de pulmomalsanoj por po 100.000 virinoj** | **Elcentaĵo de plenkreskaj virinoj laborantaj en la manufakturo** | **Speco de la virina laboro** |
|---|---|---|---|---|---|
| 14,9 | 598 | Wigan | 644 | 18,0 | kotono |
| 42,6 | 708 | Blackburn | 734 | 34,9 | kotono |
| 37,3 | 547 | Halifax | 564 | 20,4 | glatdrapo |
| 41,9 | 611 | Bradford | 603 | 30,0 | glatdrapo |
| 31,0 | 691 | Macclesf. | 804 | 26,0 | silko |
| 14,9 | 588 | Leek | 705 | 17,2 | silko |
| 36,6 | 721 | Stoke-upon-Trent | 665 | 19,3 | ceramikaĵo |
| 30,4 | 726 | Woolstanton | 727 | 13,9 | ceramikaĵo |
| – | 305 | Ok sanaj terkulturaj distriktoj | 340 | – | |

viraj laboristoj.[227] La leĝo de 1850 estis do en 1853 fine kompletigita per la malpermeso „uzi infanojn matene antaŭ kaj vespere post la junuloj kaj virinoj”. Ekde tiam, kun malmultaj esceptoj, la fabrikleĝo de 1850 reguligis en la industribranĉoj submetitaj al ĝi la labortagon de ĉiuj laboristoj.[228] De la promulgo de la unua fabrikleĝo pasis duona jarcento.[229]

227 *„Reports etc. for 30th April 1853”*, p. 30.

228 Dum la kulminaj jaroj de la angla kotonindustrio, 1859 kaj 1860, kelkaj fabrikistoj provis, per la logo de altaj salajroj por kromlaboro, persvadi la plenkreskajn virŝpinistojn ktp al longigo de la labortago. Tiuj [tiel laŭ la franca eldono -vl] ĉesigis ĉian tian iniciaton per memoraĵo direktita al la fabrikistoj, en kiu ili interalie diris: „Por diri tion rekte, nia vivo estas por ni peza ŝarĝo, kaj dum ni estas dum preskaŭ du tagoj semajne” (20 horojn) „pli longe katenitaj al la fabriko ol la aliaj laboristoj, ni sentas nin kiel helotoj” [spartanaj ŝtatsklavoj -vl] „en la lando kaj riproĉas al ni mem eternigi sistemon kiu korpe kaj morale difektas nin mem kaj niajn posteulojn … Pro tio ni sciigas vin ĉi tie respekteme ke ekde la novjara tago ni laboros neniun minuton pli ol 60 horojn semajne, de la 6-a matene ĝis la sesa vespere, kun dekalkulo de unu horo kaj duono da leĝaj paŭzoj.” („Reports etc. for 30th April 1860”, p. 30)

229 Pri la rimedoj, kiujn tiu versio de la leĝo donis por rompi ĝin, kp la parlamentan raporton: *„Factories Regulation Acts”* (9-a de aŭgusto 1859) kaj en tiu raporto la rimarkojn de Leonard Horner *„Suggestions for Amending the Factory Acts to enable the Inspectors to prevent illegal working, now become*

La leĝdonado pri fabrikoj transiris por la unua fojo siajn originan terenon en la leĝo pri la kotonpresejoj („Printworks' Act”) de 1845. La malemo per kiu la kapitalo allasis tiun novan „ekstravagancon” videblas en ĉiu linio de la leĝo! Ĝi limigas la labortagon de 8- ĝis 13-jaraj infanoj kaj por virinoj al 16 horoj inter la 6-a matene kaj la 10-a vespere, sen ia ajn leĝa paŭzo por manĝoj. Ĝi permesas laborigi virlaboristojn laŭplaĉe tage kaj nokte dum 13 jaroj.[230] Ĝi estas parlamenta abortigo.[231]

Tamen, per la venko en la grandaj industribranĉoj, kiuj estas la propra kreaĵo de la moderna produktadmaniero, la principo definitive venkis. Ĝia mirinda evoluo de 1853-1860, man-enmane kun la korpa kaj morala renaskiĝo de la fabriklaboristoj, okulfrapis la plej nevidemajn okulojn. La fabrikistoj mem, de kiuj oni iom post iom konkeris la leĝan limon kaj regulon de la labortago per duonjarcenta interna milito, fanfarone montris al la kontrasto kun la ankoraŭ „liberaj” ekspluat-regionoj.[232] La hipokrituloj de la „politika ekonomio” proklamis nun la komprenon ke necesas leĝe reguligita labortago kiel karakterizan novatingon de ilia „scienco”.[233] Facile kompreneblas ke, post kiam la fabrikestroj submetiĝis al la neeviteblo kaj eĉ repaciĝis kun la akiritaj rezultoj, la rezistkapablo de la kapitalo laŭgrade malfortiĝis, dum la laborista klaso kreskis kun la nombro de siaj aliancanoj en la sociaj tavoloj kiuj havis nenian rektan intereson pri la batalo. Pro tio okazis kompare rapida progreso ekde 1860.

La kolorigejoj kaj blankigejoj[234] estis submetitaj al la fabrikleĝo en

*very prevalent”.*

230 „Infanoj de 8 jaroj kaj pli estis efektive laborigitaj de la 6-a horo matene ĝis la 9-a vespere dum la lasta duonjaro” (1857) „en mia distrikto.” (*„Reports etc. for 31st Oct. 1857”*, p. 39)

231 „Estas koncedite ke la leĝo pri kotonpresejoj estas misfaro same en rilato al siaj edukaj kiel al siaj protektaj dispozicioj.” (*„Reports etc. for 31st Oct. 1862”*, p. 52)

232 Tiel ekz-e E. Potter en letero al la *Times* de la 24-a de marto 1863. La *Times* memorigas lin pri la fabrikista ribelo kontraŭ la dekhorleĝo.

233 Tiel i.a. s-ro W. Newmarch, kunlaboranto kaj eldonanto de la *„History of Prices”* [„Historio de prezoj” -vl] de Tooke. Ĉu estas scienca progreso fari malkuraĝajn koncedojn al la publika opinio?

234 La leĝo de 1860 pri blankigejoj kaj kolorigejoj determinas ke la labortago estu limigota la 1-an de aŭgusto 1861 provizore al 12, la 1-an de aŭgusto 1862 definitive al 10 horoj, t.e. $10^1/_2$ por labortagoj kaj $7^1/_2$ por sabatoj. Kiam la malica jaro 1862 komenciĝis, la malnova farso ripetiĝis. La sinjoroj fabrikistoj peticiis la parlamenton toleri nur por unu sola plia jaro la dekduhoran

1860, la puntfabrikoj kaj ŝtrumpteksejoj 1861. Sekve al la unua raporto de la „Komisiono pri okupado de infanoj" (1863) la manufakturo de ĉiaj tervaroj (ne nur potfarejoj), de alumetoj, de prajmoj, de kartoĉoj, de tapetoj, de kotonvelur-tondado (fustian cutting) kaj multaj procezoj kunigitaj sub la esprimo „lasta apretado" („finishing"), dividis la saman sorton. En la jaro 1863 la „blankigado en libera aero"[235] kaj la bakado estis metita sub apartajn aktojn, el kiuj la unua malpermesas i.a. la laboron de infanoj, de junuloj kaj virinoj dumnokte (de la 8-a horo vespere ĝis la 6-a matene) kaj la dua la laborigon de bakistaj submajstroj

laborigon de junuloj kaj virinoj … „Ĉe la nuna situacio" (dum la kotonkrizo) „estus granda avantaĝo por la laboristoj se oni permesus al ili labori 12 horojn tage kaj eltiri kiom eble plej da salajro … Ili jam sukcesis enigi tiusencan leĝon en la deputitan ĉambron. Ĝi fiaskis pro la agitado de la laboristoj en la blankigejoj de Skotlando." („Reports etc. for 31st Oct. 1862", p. 14, 15) Tiel batita de la laboristoj mem, en kies nomo ĝi pretendis paroli, la kapitalo nun malkovris, helpe de juristaj interpretoj, ke la leĝo de 1860, same kiel ĉiuj parlamentaj aktoj je „protekto de la laboro", redaktita en konfuzaj vortumoj, donas pretekston ekskludi la tolkalandristojn („calenderers") kaj apretistojn („finishers") el ĝia protekto. La angla jursistemo, ĉiam fidela servisto de la kapitalo, sankciis per la „civila kortumo" („Common Pleas") tiun ĉikanaĵon. „Tiu decido kaŭzis grandan malkontenton inter la laboristoj, kaj estas tre bedaŭrinde ke la evidentaj intencoj de la leĝdonintoj estas ĉirkaŭigitaj sub pre-teksto de mankhava vortdifino." (Saml., p. 18)

235 La „blankigistoj en libera aero" eskapis al la leĝo de 1860 pri „blankigado" per la mensogo ke ili ne laborigas virinojn nokte. La mensogo estis malkovrita de la fabrikinspektistoj, kaj samtempe la parlamento, legante la peticiojn de la laboristinoj, perdis ĉiajn sentojn de freŝeco kiun ĝi ĝis tiam havis ĉe la elvoko de „blankigo en libera aero". En tiu liberaera blankigejo oni uzas sekigo-ĉambrojn kun 90 ĝis 100 farenhejtaj gradoj en kiuj laboris ĉefe knabinoj. „Malvarmiĝo" („cooling") estas la teĥnika esprimo por okaza eskapo el la sekiga ĉambro. „Dek kvin knabinoj en la sekigaj ĉambroj. Varmego de 80 ĝis 90 gradoj por tolaĵo, de 100 kaj pli da gradoj por batistaĵoj („cambrics"). Dek du knabinoj gladas kaj kunfaldas en ĉambreto de proksimume 10 kvadratpied-oj, hejtata de komplete fermita forno en la mezo. Ili staras ĉirkaŭ la forno kiu elradias teruran varmegon kaj rapide sekigas la batistaĵojn por la gladistinoj. La hornombro por «tiuj manoj» ne estas limigita. Kiam estas multa laboro, ili laboras ĝis la 9-a aŭ 12-a horo nokte multajn tagojn sinsekve." („Reports etc. for 31st Oct. 1862", p. 56) Kuracisto deklaras: „Por malvarmiĝo, apartaj horoj ne estas permesitaj, sed kiam la temperaturo fariĝas tro neeltenebla, aŭ kiam la manoj de la laboristinoj malpuriĝas de ŝvito, ili rajtas eliri por kelkaj minutoj … Mia konsiderinda sperto pri kuracado de la malsanoj de tiuj laboristinoj devigas min konstati ke ilia sanstato estas multe sub tiu de la kontonŝpinist-inoj" (kaj la kapitalo, en siaj peticioj al la parlamento, estis pentrinta ilin, laŭ

malpli ol 18-jaraj inter la 9-a vespere kaj la 5-a matene. Ni revenos poste al la postaj proponoj de la nomita komisiono kiuj, escepte de kampkulturado, minejoj kaj transporto, minacis prirabi ĉiujn gravajn anglajn industribranĉojn je ilia „libereco”.[236]

# 7. La batalo pri la norma labortago. Retroefiko de la angla fabrikleĝaro sur aliaj landoj

La leganto memoras ke la specifa enhavo kaj celo de la kapitalisma produktado estas la produktado de plusvaloro aŭ la eltirado de pluslaboro, senkonsidere al ĉia transformiĝo de la produktadmaniero kiu povas estiĝi pro la subordigo de la laboro sub la kapitalon. Li memoras ke laŭ la vidpunkto disvolvita ĝis ĉi tie, nur la laboristo sendependa – kaj do leĝe kvalifikita agi por si mem – kiel varvendisto kontraktas kun la kapitalisto. Se en nia historia skizo ni donis gravan rolon unuflanke al la moderna industrio, aliflanke al la laboro de infanoj kaj de personoj korpe kaj jure ne plenkreskaj, tiu industrio estis por ni nur aparta ekzemplo de ekspluatado de laboro. Tamen, sen anticipi la postan disvolvadon, jen kio rezultas

la maniero de Rubenso, flore sanaj!). „Iliaj plej okulfrapaj malsanoj estas ftizo, bronĥito, utermalsanoj, histerio en plej horora formo kaj reŭmatismo. Ĉiuj ĉi fontas, kiel mi kredas, rekte aŭ malrekte, el la trovarmigita aero de iliaj laborĉambroj kaj el la manko de sufiĉa komforta vestaĵo por protekti ilin dum ilia hejmeniro en la vintraj monatoj kontraŭ la malvarma kaj humida atmosfero.” (saml., p. 56, 57) La fabrikinspektistoj rimarkigas pri la aldona leĝo de 1863, elluktita kontraŭ tiuj liberaeraj blankigistoj: „Tiu ĉi akto ne nur maltrafis doni al la laboristoj la protekton kiun ĝi ŝajnas doni … ĝi estas formulita tiel ke la protekto komenciĝas nur ekde kiam oni malkovras infanojn kaj virinojn post la 8-a horo vespere ĉe la laboro, kaj eĉ tiam la preskribita pruvmetodo havas tiajn klaŭzojn ke puno povas nur malofte okazi.” (saml., p. 52) „Kiel leĝo kun humana kaj eduka celo ĝi estas komplete manka. Fine oni ne diru ke estas humane, permesi al virinoj kaj infanoj, aŭ, kio estas la samo, devigi ilin labori dek kvar horojn tage kaj eble eĉ pli longan tempon, kun aŭ sen ripozo, laŭ la cirkonstancoj, sen limo koncerne la aĝon, sen distingo de sekso kaj sen respekto de la sociaj kutimoj de la familioj de la najbareco en kiu la blankigejoj troviĝas.” („Reports etc. for 30th April 1863”, p. 40)

236 *Noto al la 2-a eldono:* Ekde 1866, kiam mi skribis tiun tekston, ree okazis reago. La kapitalistoj, en la industribranĉoj minacataj esti submetitaj al la fabrikleĝaro, uzis sian tutan influon sur la parlamento por subteni sian „civitanan rajton” je senlima ekspluatado de la laborforto. Ili trovis kompreneble en la liberala ministrejo de Gladstone bonvolemajn servistojn.

el la simpla kunteksto de la historiaj faktoj:

Unue: La dezirego de la kapitalo je senmezura kaj senrespekta longigo de la labortago kontentiĝis unue en la industrioj unue revoluciigitaj per akvo, vaporo kaj maŝinaro, en tiuj unuaj kreaĵoj de la moderna produktadmaniero, en la koton-, lan-, lin-, silk-ŝpinejoj kaj teksejoj. La ŝanĝita materia produktadmaniero kaj la laŭ ĝi ŝanĝitaj sociaj rilatoj de la produktantoj[237] estis la unua kaŭzo de la senmezuraj ekscesoj kaj tiam provokas la kontraŭan socian kontrolon kiu leĝe limigas, reguligas kaj unuformigas la labortagon kun ĝiaj paŭzoj. Tiu kontrolo ŝajnas do dum la unua duono de la 19-a jarcento nur kiel escepta leĝdonado.[238] Ekde kiam ĝi estis konkerinta la originan kampon de la nova produktadmaniero, montriĝis ke intertempe ne nur multaj aliaj produktadbranĉoj eniris la veran fabrikreĝimon, sed ke manufakturoj kun pli aŭ malpli malmoderniĝintaj metodoj, kiel potfarejoj, vitrofarejoj ktp, ke malnovaj metioj kiel bakado, kaj fine eĉ la dise produktanta tiel nomata hejmlaboro, kiel najlofarado ktp[239], estis jam delonge falintaj en la kampon de kapitalisma ekspluatado kiel la fabriko mem. La leĝdonado estis do devigita iom post iom demeti sian esceptecon, aŭ, kie ĝi procedas laŭ la romia kazuistiko, kiel en Anglio, laŭ la respektiva taŭgeco, deklari domon, en kiu oni laboras, fabriko (factory).[240]

Due: La historio de regulado de la labortago en kelkaj produktadbranĉoj, kaj la daŭraj bataloj pri tiu regulado en aliaj branĉoj, pruvas ĝis evidento ke la individua laboristo, la laboristo kiel „libera" vendanto de sia laborforto, sur certa ŝtupo de matureco de la kapitalisma produktado,

237 „La konduto de ĉiu el tiuj klasoj (kapitalistoj kaj laboristoj) estis la rezulto de la respektiva situacio en kiun ili estis metitaj." („Reports etc. for 31st Oct. 1848", p. 113)

238 „La laboroj kiuj submetiĝis al la limigo estis ligitaj kun la produktado de toloj helpe de vapor- aŭ akvo-forto. Laboro devis plenumi du kondiĉojn por esti submetita al la protekto de la fabrikinspektado, nome la aplikadon de vapor- aŭ akvo-forto kaj la prilaboradon de certaj specialaj fibraj materialoj." („Reports etc. for 31st October 1864", p. 8)

239 Pri la situacio de tiuj tiel nomataj hejmaj industrioj troviĝas eksterordinare riĉa materialo en la lastaj raportoj de la „Children's Employment Commission".

240 „La leĝoj de la lasta sesia periodo (1864) … koncernas diverstipajn laborbranĉojn, en kiuj regas tre diversaj kutimoj, kaj la aplikado de meĥanika forto por funkciigi la maŝinaron jam ne apartenas, kiel antaŭe, al la nepraj kondiĉoj sub kiuj entrepreno estis konsiderata fabriko en la senco de la leĝo." („Reports etc. for 31st Oct. 1864", p. 8)

estas venkata sen ebleco rezisti. La kreado de norma labortago estas do la produkto de longa kaj komplika, pli aŭ malpli kaŝita interna milito inter la kapitalista klaso kaj la laborista klaso. Kiel la batalo komenciĝis unue en la kampo de la moderna industrio, ĝi okazis do unue en la patrujo mem de tiu industrio, en Anglio.[241] La anglaj fabriklaboristoj estis la ĉampionoj ne nur de la angla, sed de la moderna laborista klaso entute, kiel ankaŭ ilia teoriistoj atakis la unuaj la teorion de la kapitalo.[242] La fabrikfilozofo Ure denuncas do kiel neestingeblan honton de la angla laborista klaso, ke ĝi skribis „la sklaveco de la fabrikaktoj" sur siajn flagojn fronte al la kapitalo, kiu virece batalis por „plena libereco de la laboro".[243]

Francio malrapide postlamas malantaŭ Anglio. Ĝi bezonas la februaran revolucion por naski la dekduhorleĝon[244], kiu estas multe pli mankhava ol

241 Belgio, la paradizo de la kontinenta liberalismo, montras eĉ ne spuron da tiu movado. Eĉ en ĝiaj karb- kaj metal-minejoj oni ekspluatas laboristojn de ambaŭ seksoj kaj de ĉia aĝo kun kompleta „libereco" por ĉia ajn tempa daŭro kaj tempa periodo. El po mil dungitoj estas 733 viroj, 88 virinoj, 135 knaboj kaj 44 knabinoj malpli ol 16-jaraj; ĉe la altfornoj ktp, el po mil estas: 668 viroj, 149 virinoj, 98 knaboj kaj 85 knabinoj malpli ol 16-jaraj. Aldoniĝas malalta salajro kompare kun eksterordinara ekspluatado de laborfortoj ĉu en matura aĝo ĉu en nematura; en taga mezumo 2 ŝ. 8 d. por viroj, 1 ŝ. 8 d. por virinoj, 1 ŝ. $2^1/_2$ d. por knaboj. Tiel Belgio en 1863, kompare kun 1850, duobligis la kvanton kaj la valoron de siaj eksportoj de karbo, de fero ktp.

242 Kiam Roberto Oveno mallonge post la unua jardeko de tiu ĉi jarcento defendis la neceson de limigo de la labortago ne nur teorie, sed reale enkondukis la dekhortagon en sian fabrikon en New-Lanark, oni priridis tion kiel komunistan utopion, same kiel lian „ligon de produktiva laboro kun edukado de la infanoj", same kiel la kooperativajn magazenojn de la laboristoj, kreitajn de li. Nuntempe la unua utopio estas fabrikleĝo, la dua aperas kiel oficiala frazo en ĉiuj fabrikaktoj (factory acts), kaj la tria servas jam eĉ al mantelo por kovri reakciajn tromp-manovrojn.

243 Ure, „Philosophie des Manufactures", Prizo, 1836, vol. II, p. 39, 40, 67, 77 ktp.

244 En la raporto de la „Internacia statistika kongreso en Parizo, 1855" legeblas i.a.: „La franca leĝo kiu limigas la daŭron de la ĉiutaga laboro en fabrikoj kaj laborejoj al 12 horoj, ne limigas tiun laboron ene de certaj fiksaj horoj (tempoperiodoj), nur por la infanlaboro la periodo inter la 5-a horo matene kaj la 9-a vespere estas preskribita. Pro tio, parto de la fabrikistoj uzas la rajton kiun donas al ili tiu fatala silento por tagon post tago, eble kun la escepto de dimanĉo, laborigi seninterrompe. Ili aplikas por tio du diversajn laboristajn vicojn, el kiuj neniu restas pli longe ol 12 horojn en la laborejo, sed la laboro de la establo daŭras tage kaj nokte. La leĝo estas kontentigita, sed ĉu ankaŭ la humaneco?" Oni tie emfazas krom la „detruan influon de noktlaboro sur la

ĝia angla originalo. Malgraŭ tio, la franca revolucia metodo havas ankaŭ siajn apartajn avantaĝojn. Ĝi diktas per la sama frapo al ĉiuj laborejoj kaj fabrikoj sendistinge la saman limigon de la labortago, dum la angla leĝdonado cedas jen ĉe iu punkto, jen ĉe alia, kontraŭvole al la premo de la cirkonstancoj kaj ĉiam pretas elkovi tutan aron da juraj elturniĝoj.[245] Aliflanke la franca leĝo proklamas principe tion, kio en Anglio estas nur elbatalita nome de infanoj, neplenkreskuloj kaj virinoj kaj nur lastatempe konsiderata kiel ĝenerala rajto.[246]

En Usono ĉia memstara laborista movado restis paralizita tiom longe, kiom la sklavismo makulis parton de la respubliko. La laboro en blanka haŭto ne povas emancipiĝi, kie en nigra haŭto ĝi estas brulstampata. Sed el la morto de la sklavismo tuj elkreskis nova juna vivo. La unua frukto de la interna milito estis la agitado por la okhortago, elpaŝanta per lokomotiva rapideco de la Atlantika ĝis la Pacifika Oceano, de Nov-Anglio ĝis Kalifornio. La ĝenerala laborista kongreso en Baltimoro (aŭgusto 1866) deklaras:

> „La unua kaj granda neceso de la nuntempo, por liberigi la laboron de tiu ĉi landoj el la kapitalisma sklaveco, estas decido de leĝo per kiu 8 horoj konsistigas en ĉiuj ŝtatoj de la amerika unio la norman labortagon. Ni estas deciditaj uzi nian tutan povon ĝis kiam tiu glora rezulto estos atingita."[247]

---

homa organismo" ankaŭ „la fatalan influon de la nokta asociado de ambaŭ seksoj en la samaj malhele lumigataj laborejoj".

245 „Ekz-e en mia distrikto, en la samaj fabrikkonstruaĵoj, la sama fabrikisto estas blankigisto kaj kolorigisto sub la «Akto pri blankigejoj kaj kolorigejoj», presisto sub la «Akto pri presistoj» kaj apretisto sub la «fabrikleĝo» …" („Report of Mr. Baker i en „Reports etc. for 31st Oct. 1861", p. 20) Post nombri la diversajn dispoziciojn de tiuj leĝoj kaj de la komplikaĵo sekvanta el ili, s-ro Baker diras: „Oni vidas kiom malfacile devas esti certigi la plenumadon de tiuj 3 parlamentaj aktoj, se plaĉas al la fabrikestro ĉirkaŭiri la leĝon." [l.c., p. 21] Sed kio per tio estas certigita al la sinjoroj juristoj, tio estas procesoj.

246 Tiel la fabrikinspektistoj fine kuraĝas diri: „Tiuj kontraŭargumentoj (de la kapitalo kontraŭ leĝa limigo de la labortempo) devas cedi pro la granda principo de la rajtoj de la laboro … ekzistas tempopunkto ĉe kiu la rajto de la entreprenisto pri la laboro de sia laboristo ĉesas kaj tiu povas mem disponi pri sia tempo, eĉ se li ankoraŭ ne estas elĉerpita." („Reports etc. for 31st Oct. 1862", p. 54)

247 „Ni, la laboristoj de Dunkirk, deklaras, ke la longeco de la labortempo postulata sub la nuna sistemo estas tro granda kaj ne lasas al la laboristo tempon por ripozo kaj disvolviĝo, sed male premas lin al situacio de servuto kiu malmulte pli bonas ol sklaveco (a condition of servitude but little better than slavery). Pro tio [ni] decidis ke 8 horoj por labortago sufiĉas kaj devas esti leĝe agnosk-

Samtempe (komence de septembro 1866) la „Internacia Laborista Kongreso” en Ĝenevo decidis, laŭ propono de la londona Ĝenerala Konsilantaro:

> „Ni deklaras la limigon de la labortago kiel provizoran kondiĉon, sen kiu ĉiuj aliaj streboj je emancipiĝo devas fiaski … Ni proponas 8 laborhorojn kiel leĝan limon de la labortago.”

Tiel la laborista movado elkreskinta instinktive el la produktadkondiĉoj mem sigelas la eldiron de la angla fabrikinspektisto R. J. Saunders:

> „Pliaj paŝoj al reformo de la socio neniam fareblas kun ia ajn perspektivo de sukceso, se ne antaŭe la labortago estas limigita kaj ĝia preskribita limo strikte trudata.”[248]

Oni devas koncedi ke nia laboristo elvenas el la produktadprocezo alia ol li eniris ĝin. En la merkato li kiel posedanto de la varo „laborforto” alpaŝis aliajn varposedantojn, varposedanto al la varposedanto. La kontrakto, per kiu li vendis sian laborforton al la kapitalisto, iel pruvis per presitaj literoj ke li libere disponas pri si mem. Post kontraktinta komerco oni malkovras, ke li ne estis „libera aganto”, ke la tempo, por kiu li kapablas vendi sian laborforton, estas la tempo por kiu li estas devigata vendi ĝin[249], ke fakte la vampiro kiu suĉas lin ne delasas lin se restas ankoraŭ ekspluatebla muskolo, nervo, guto da sango.[250] Por „protekto” kontraŭ „la serpento de iliaj turmentoj”[251] la laboristoj devas kunigi siajn kapojn kaj kiel klaso trudi ŝtatan leĝon, potencegan socian malhelpon, kiu malhelpas ilin mem, per libervola kontrakto kun la kapitalo vendi sin kaj

ataj kiel sufiĉaj; ke ni alvokas por nia subteno la gazetaron, la potencan levilon … kaj konsideras ĉiujn, kiuj rifuzas tiun subtenon, kiel malamikojn de la laborreformo kaj de la laboristaj rajtoj.” (Decidoj de la laboristoj en Dunkirk, ŝtato Novjorko, 1866)

248 „Reports etc. for 31st Oct. 1848”, p. 112.

249 „Tiuj manovroj (de la kapitalo ekz-e 1848-1850) alportis krome la nerefuteblan pruvon, kiom malĝustas la tiom ofte ripetata aserto, ke la laboristoj ne bezonas protekton, sed estas konsiderendaj kiel libere disponantaj posedantoj de sia sola proprieto kiun ili havas, la laboro de siaj manoj kaj la ŝvito de sia frunto.” („Reports etc. for 30th April 1850”, p. 45) „Libera laboro, se ĝi entute nomeblas tia, bezonas por sia protekto eĉ en libera lando la fortan brakon de la leĝo.” („Reports etc. for 31st Oct. 1864”, p. 34) „Permesi, kio same signifas devigi, … labori 14 horojn tage kun aŭ sen manĝoj ktp.” („Reports etc. for 30th April 1863”, p. 40)

250 Friedrich Engels, „Die englische Zehnstundenbill” [Frederiko Engelso, „La angla dekhorleĝo”], l.c., p. 5 <Vd volumon 7, p. 233>

251 Esprimo de Henriko Hejno [Heinrich Heine]. -vl

sian idojn al sklaveco kaj morto.[252]

La pompa katalogo de la „necedeblaj homrajtoj" estas tiel anstataŭigita per modesta „granda ĉarto" de leĝe limigita labortago, kiu „fine klarigas, kiam finiĝas la tempo kiun la laboristo vendis, kaj kiam la tempo komenciĝas kiu apartenas al li mem"[253] Kia granda ŝanĝo[254]!

252 La dekhorleĝo, en la industribranĉoj submetitaj al ĝi, „savis la laboristojn el kompleta degenero kaj protektis ilian korpan kondiĉon". (Reports etc. for 31st Oct. 1859", p. 47) „La kapitalo (en la fabrikoj) povas neniam teni la maŝinaron funkcianta tra limigita tempa periodo sen difekti la sanon kaj moralon de la tie laborantojn; kaj tiuj ne estas en situacio por protekti sin mem." (l.c., p. 8)

253 „Estas ankoraŭ pli granda avantaĝo ke oni fine distingas klare inter la tempo kiu apartenas al la laboristo mem kaj tiu kiu apartenas al lia entreprenisto. La laboristo scias nun kiam la tempo, kiun li vendas, finiĝas kaj lia propra tempo komenciĝas, kaj ĉar li tion antaŭe precize scias, li povas antaŭe disponi pri siaj propraj minutoj por siaj propraj celoj." (saml., p. 52) „Per tio ke ili (la fabrikleĝoj) faris ilin regantoj de sia propra tempo, ili donis al ili moralan energion, kiu kondukas ilin eble al ekposedo de la politika potenco." (saml., p. 47) Kun retenita ironio kaj tre prudentaj esprimoj la fabrikinspektistoj aludas ke la nuna dekhorleĝo iomete liberigis ankaŭ la kapitaliston el lia natura brutaleco kiel nura enkorpiĝo de kapitalo kaj donis al li tempon por ioma „kleriĝo". Antaŭe „la entreprenisto havis tempon por nenio alia ol mono, la laboristo por nenio alia ol laboro". (saml., p. 48)

254 *En la originalo:* Quantum mutatus ab illo! <Kia granda ŝanĝo!>

# *NAŬA ĈAPITRO – Kvoto kaj kvanto de la plusvaloro*

Kiel ĝis nun, en tiu ĉi ĉapitro la valoro de la laborforto, do de la parto de la labortago necesa por la reproduktado aŭ konservado de la laborforto, estas supozata kiel donita, konstanta grando.

Sub tiu kondiĉo, kun la kvoto estas samtempe donita la kvanto de la plusvaloro, kiun la individua laboristo liveras al la kapitalisto en difinita tempa periodo. Se ekz-e la necesa laboro estas tage 6 horoj, esprimita en orkvanto de 3 ŝilingoj = 1 talero, tiam la talero estas la taga valoro de laborforto aŭ la kapitalvaloro antaŭpagita per la aĉeto de la laborforto. Se krome la kvoto de la plusvaloro estas 100 %, tiam tiu varia kapitalo de 1 talero produktas kvanton da plusvaloro de 1 talero, aŭ la laboristo liveras ĉiutage kvanton da pluslaboro de 6 horoj.

Sed la varia kapitalo estas la monesprimo por la ĉiomvaloro de ĉiuj laborfortoj kiujn la kapitalisto samtempe laborigas. Ĝia valoro estas do egala al la mezuma valoro de laborforto, obligita per la nombro da aplikataj laborfortoj. Ĉe donita valoro de la laborforto la grando de la varia kapitalo estas do en rekta proporcio al la nombro da samtempe okupataj laboristoj. Se la taga valoro de laborforto = 1 talero, tiam do necesas antaŭpagi kapitalon de 100 taleroj por ekspluati tage 100 laborfortojn, de *n*-oble 1 talero por ekspluati tage *n* laborfortojn.

Same, se varia kapitalo de 1 talero, la valoro de unu laborforto, produktas tagan plusvaloron de 1 talero, tiam varia kapitalo de 100 taleroj produktas tagan plusvaloron de 100, kaj varia kapitalo de *n* taleroj tagan plusvaloron de 1 talero x *n*. La kvanto de la produktata plusvaloro estas do egala al la plusvaloro kiun la labortago de la unuopa laboristo liveras, obligita per la nombro de la aplikataj laboristoj. Sed ĉar krome la kvanto da plusvaloro kiun la unuopa laboristo produktas, ĉe donita valoro de la laborforto, estas determinita de la kvoto de la plusvaloro, tial sekvas tiu ĉi unua leĝo: La kvanto de la produktata plusvaloro estas egala al la grando de la antaŭpagita varia kapitalo obligita per la kvoto de la plusvaloro, aŭ ĝi egalas al la valoro de unu laborforto, obligita per la grado de ĝia ekspluatado, obligita per la nombro da samtempe ekspluatataj laborfort-

oj.[255]

Do, se ni nomas la kvanton de la plusvaloro P, la plusvaloron, kiun la unuopa laboristo en taga mezumo liveras, *p*, la per la aĉeto de la unuopa laborforto ĉiutage antaŭpagatan varian kapitalon *v*, la totalan sumon de la varia kapitalo V, la valoron de unu mezuma laborforto *f*, ĝian ekspluatgradon $^{l'}/_{l}$ $^{(pluslaboro)}/_{(necesa\ laboro)}$ kaj la nombron da aplikataj laboristoj *n*, tiam ni ricevas:

$$P = (p/v * V$$

$$= f * {}^{l'}/_{l} * n$$

Ni supozu daŭre, ne nur ke la valoro de mezuma laborforto estas konstanta, sed ke la laboristoj aplikataj de kapitalisto estas reduktitaj al mezumaj laboristoj. Ekzistas esceptaj kazoj, kie la produktata plusvaloro ne kreskas proporcie al la nombro da ekspluatataj laboristoj, sed tiam ankaŭ la valoro de la laborforto ne restas konstanta.

En la produktado de certa kvanto da plusvaloro, la malpliiĝo de unu faktoro kompenseblas per pliiĝo de la alia faktoro. Se la varia kapitalo malpliiĝas kaj samtempe samproporcie la kvoto de la plusvaloro altiĝas, tiam la kvanto de la produktita plusvaloro restas senŝanĝa. Se sub la antaŭa supozo la kapitalisto devas antaŭpagi 100 talerojn por ekspluati tage 100 laboristojn, kaj se la kvoto de la plusvaloro estas 50 %, tiam tiu varia kapitalo de 100 taleroj donas plusvaloron de 50 taleroj, aŭ de 100 x 3 laborhoroj. Se la kvoto de plusvaloro duobliĝas, aŭ la labortago longiĝas anstataŭ de 6 al 9, de 6 al 12 horoj, tiam la kapitalo reduktita al duono de 50 taleroj donas same plusvaloron de 50 taleroj, aŭ de 50 x 6 laborhoroj. Malpliigo de la varia kapitalo do kompenseblas per proporcia altigo de la grado de ekspluatado de la laborforto, aŭ la malaltigo de la nombro da okupataj laboristoj per proporcia longigo de la labortago. Ene de certaj limoj, la kvanto da laboro ekspluatebla de la kapitalo fariĝas do sendependa de la nombro da laboristoj.[256]

Inverse, malpliiĝo de la kvoto de plusvaloro lasas la kvanton de la

---

255 La dua parto de la frazo estas formulita laŭ la aŭtentigita franca eldono. -vl

256 Tiu elementa leĝo ŝajnas esti ne konata de la sinjoroj de la vulgarekonomio kiuj, inverse al Arĥimedo, kredas esti trovintaj, en la determinado de la merkatprezoj de la laboro per postulo kaj propono. la apogpunkton, ne por levi la mondon, sed por haltigi ĝin.

produktata plusvaloro senŝanĝa, se proporcie la grando de la varia kapitalo aŭ la nombro da okupataj laboristoj kreskas.

Tamen la kompensado de la laborista nombro aŭ de la grando de la varia kapitalo per pli alta kvoto de la plusvaloro aŭ per longigo de la labortago havas nesupereblajn limojn. Kia ajn estas la valoro de la laborforto, do ĉu la labortempo necesa por la konservado de la laboristo estas 2 aŭ 10 horoj, la suma valoro kiun laboristo povas ĉiutage produkti estas ĉiam malpli granda ol la valoro en kiu konkretiĝas 24 laborhoroj, malpli granda ol 12 ŝ. aŭ 4 taleroj, se tiuj estas la monesprimo de 24 konkretigitaj laborhoroj. Sub nia antaŭa supozo, laŭ kiu necesas ĉiutage 6 laborhoroj por reprodukti la laborforton mem aŭ por kompensi la kapitalvaloron antaŭpagitan en ĝia aĉeto, varia kapitalo de 500 taleroj, kiu laborigas 500 laboristojn je plusvalora kvoto de 100 % aŭ per dekduhora labortago, produktas ĉiutage plusvaloron de 500 taleroj aŭ 6 x 500 laborhoroj. Kapitalo de 100 taleroj, kiu laborigas 100 laboristojn tage je plusvalora kvoto de 200 % aŭ per 18-hora labortago, produktas nur kvanton de plusvaloro de 200 taleroj aŭ 12 x 100 laborhoroj. Kaj ĝia ĉioma valorprodukto, ekvivalento de la antaŭpagita varia kapitalo plus plusvaloro, povas tagon post tago neniam atingi la sumon de 400 taleroj aŭ 24 x 100 laborhoroj. La absoluta limo de la mezuma labortago, kiu estas nature ĉiam pli malgranda ol 24 horoj, konsistigas absolutan limon por la anstataŭigo de malpli granda varia kapitalo per altigita kvoto de plusvaloro aŭ de malpli granda nombro da laboristoj per pli alta ekspluatgrado de la laborforto. Tiu evidenta dua leĝo gravas por klarigi multajn fenomenojn kiuj fontas el la poste klarigenda tendenco de la kapitalo kiom eble plej redukti la nombron da laboristoj dungitaj de ĝi aŭ sian parton transformitan en varia laborforto, en kontraŭdiro al ĝia alia tendenco produkti la kiom eble plej grandan kvanton da plusvaloro. Inverse: Se la kvanto de la uzataj laborfortoj aŭ la grando de la varia kapitalo kreskas, sed ne proporcie al la malkresko de la kvoto de la plusvaloro, tiam la kvanto de produktata plusvaloro malkreskas.

Tria leĝo rezultas el la determinado de la kvanto de la produktata plusvaloro per la du faktoroj, kvoto de la plusvaloro kaj grando de la antaŭpagita varia kapitalo. Ĉe donita kvoto de plusvaloro aŭ ekspluatgrado de la laborforto, kaj valoro de la laborforto aŭ grando de la necesa labortempo, estas memkompreneble ke, ju pli grandas la varia kapitalo des pli grandas la kvanto de la produktataj valoro kaj plusvaloro. Se la limo de la labortago estas donita kaj ankaŭ la limo de ĝia necesa parto, tiam la kvanto de valoro kaj de plusvaloro kiujn individua kapitalisto

produktas, dependas evidente nur de la kvanto da laboro kiun li funkciigas. Sed tiu dependas, sub la supozataj donitaĵoj, de la kvanto da laborfortoj aŭ de la nombro da laboristoj kiujn li ekspluatas, kaj tiu nombro estas siavice determinata de la grando de la varia kapitalo kiun li antaŭpagas. Ĉe donita kvoto de la plusvaloro kaj donita valoro de la laborforto la kvantoj de la produktata plusvaloro estas do en rekta proporcio al la grandoj de la antaŭpagitaj variaj kapitaloj.

Sed oni scias ke la kapitalisto dividas sian kapitalon en du partojn. Li elspezas unu parton por produktadrimedoj. Tiu estas la konstanta parto de lia kapitalo. La alian parton li transformas en vivan laborforton. Tiu parto konsistigas lian varian kapitalon. Surbaze de la sama produktadmaniero en la diversaj produktadbranĉoj okazas diversa divido de la kapitalo en konstantan kaj varian parton. Ene de la sama produktadbranĉo tiu proporcio ŝanĝiĝas kun ŝanĝiĝanta teĥnika bazo kaj socia kombinado de la produktadprocezo. Sed kiel ajn donita kapitalo dividiĝas en konstantan kaj varian partojn, ĉu la varia proporcias al la konstanta kiel 1 : 2, 1 : 10 aŭ 1 : x, la ĵus starigita leĝo ne estas tuŝata de tio, ĉar laŭ nia antaŭa analizo la valoro de la konstanta kapitalo ja reaperas en la produktvaloro, sed ne eniras en la novkreitan valorprodukton. Por laborigi 1.000 ŝpinistojn, necesas kompreneble pli da krudmaterialoj, ŝpiniloj ktp ol por laborigi 100. Sed la valoro de tiuj aldonitaj produktadrimedoj povas kreski, malkreski, resti senŝanĝa, esti granda aŭ malgranda, ĝi restas sen ia ajn influo sur la plivalorigprocezo de la laborfortoj kiuj movas ilin. La supre konstatita leĝo alprenas do jenan formon: La kvantoj de valoro kaj de plusvaloro produktataj de diversaj kapitaloj rilatas ĉe donita valoro kaj ĉe samgranda ekspluatadgrado de la laborforto rekte kiel la grandoj de la variaj partoj de tiuj kapitaloj, t.e. de ilia en vivan laborforton transformitaj partoj.

Tiu leĝo evidente kontraŭdiras ĉian sperton bazitan sur la ŝajno[257]. Ĉiu scias ke kotonŝpinisto, kiu aplikas relative multan konstantan kaj malmultan varian kapitalon, pro tio ne rikoltas pli malgrandan gajnon aŭ plusvaloron ol bakisto kiu movas relative multan varian kaj malmultan konstantan kapitalon. Por solvi tiun ŝajnan kontraŭdiron oni bezonas ankoraŭ multajn interajn termojn, same kiel el vidpunkto de la elementa algebro necesas multaj interaj termoj por kompreni ke elcentaĵo povas esti reala grando. Kvankam ĝi neniam formulis la leĝon, la klasika ekonomiko insistas instinktive je tio, ĉar ĝi estas nepra konsekvenco de la valorleĝo

257 *Laŭvorte:* „auf den Augenschein …” – „sur la juĝo laŭ tio kion oni vidas”. -vl

entute. Ni vidos poste[258], kiel la skolo de Ricardo stumblis super tiu obstaklo. La vulgarekonomio, kiu fakte „lernis neniom”, ĉi tie kiel aliloke fanfaronas pri la ŝajno por nei la leĝon kiu reguligas kaj klarigas la fenomenojn. Kontraste al Spinozo, ĝi kredas ke „nescio estas sufiĉa kialo”.

La laboro kiu estas tagon post tago movata de la ĉiomkapitalo konsidereblas kiel unu sola labortago. Se ekz-e la nombro da laboristoj estas unu miliono kaj la mezuma labortago de laboristo estas 10 horoj, tiam la socia labortago konsistas el 10 milionoj da horoj. Ĉe donita longo de tiu labortago, egale ĉu ties limoj estas difinitaj korpe aŭ socie, la kvanto de la plusvaloro pliigeblas nur per pliigo de la nombro da laboristoj, t.e. de la laborista loĝantaro. La kresko de la loĝantaro konsistigas ĉi tie la matematikan limon por produktado de plusvaloro per la socia ĉiomkapitalo. Inverse, ĉe donita grando de la loĝantaro tiu limo estas determinata de la ebla longigo de la labortago.[259] Oni vidos en la sekva ĉapitro ke tiu leĝo validas nur por la ĝis nun traktita formo de plusvaloro.

El la ĝisnuna analizado de la produktado de la plusvaloro rezultas ke ne ĉia ajn mon- aŭ valor-sumo transformeblas en kapitalon. Por tiu transformado necesas certa minimumo da mono aŭ da interŝanĝvaloro en la manoj de la individua posedanto de mono aŭ de varo. La minimumo da varia kapitalo estas la kostoprezo de unu unuopa laborforto, kiu tra la tuta jaro, tagon post tago, estas uzata por produktado de plusvaloro. Se tiu laboristo estus posedanto de siaj propraj produktadrimedoj kaj se li kontentiĝus per vivo de laboristo, tiam la labortempo necesa por reproduktado de liaj vivrimedoj, ekz-e de 8 horoj tage, sufiĉus al li. Li bezonus do ankaŭ nur produktadrimedojn por 8 laborhoroj. La kapitalisto, male, kiu laborigas lin krom tiujn 8 horojn ekz-e dum 4 horoj da pluslaboro, bezonas kroman monsumon por akiri la kromajn produktadrimedojn. Sed sub nia supozo li devus laborigi jam du laboristojn por povi vivi nur kiel laboristo, el la ĉiutaga alproprigata plusvaloro, t.e. por povi kontentigi siajn necesajn bezonojn. En tiu kazo la nura vivtenado estus la celo de lia produktado, ne pliigo de la riĉaĵo, sed ĝuste tiu estas la implicita celo de la kapitalisma produktado. Por ke li vivu nur duoble bone ol ordinara laboristo kaj retransformu la duonon de la produktita plusvaloro en kapitalon, li devus okobligi samtempe kun la nombro da laboristoj la

258 *En la kvara libro.* [La frazo kaj la noto estas aldono de la franca eldono. -vl]

259 „La laboro de socio, tio estas la tempo aplikata en la ekonomio, estas donita grando, ni diru 10 horoj tage de unu miliono da homoj aŭ 10 milionoj da horoj … La kapitalo estas limigita en sia kresko. En ĉiu donita periodo tiu limo konsistas el la reala amplekso de la tempo aplikata en la ekonomio.” („An Essay on the Political Economy of Nations”, Londono, 1821, p. 47, 49)

minimumon da antaŭpagata kapitalo. Li povus ja ankaŭ mem, same kiel lia laboristo, rekte kunlabori en la produktadprocezo, sed tiam li estus ankaŭ nur io meza inter kapitalisto kaj laboristo, „malgranda majstro”. Certa grado de alteco de la kapitalisma produktado postulas ke la kapitalisto povu dediĉi la tutan tempon dum kiu li funkcias kiel kapitalisto, t.e. kiel personigita kapitalo, por alproprigo kaj do kontrolado de fremda laboro kaj por vendo de la produktoj de tiu laboro.[260] La korporacia sistemo de la mezepoko provis malebligi la transformiĝon de la metia majstro en kapitaliston per tio ke ĝi limigis la nombron da laboristoj, kiujn unuopa majstro rajtis laborigi, je tre malgranda maksimumo. La mon- aŭ var-posedanto transformiĝis vere en kapitaliston nur tie kie la minimuma sumo antaŭpagita por la produktado ege superis la mezepokan maksimumon. Ĉi tie, kiel en la naturscienco, montriĝas la ĝusteco de la leĝo malkovrita de Hegelo en lia „Logiko”, ke nur kvantaj ŝanĝiĝoj je certa punkto transformiĝas en kvalitajn diferencojn.[261]

260„La farmisto devas ne kalkuli kun sia propra laboro, kaj se li faras tion, li per tio perdos, laŭ mia opinio. Lia agado konsistu el la kontrolado de la tutaĵo: li devas atenti siajn draŝistojn, ĉar alie la salajro estus baldaŭ forĵetita por greno ne eldraŝita; same li devas konstante kontroli siajn falĉistojn, rikoltistojn ktp; li devas konstante kontroli la staton de siaj bariloj; li devas atenti ĉu nenio estas neglektata; tio estus la kazo se li limigus sin je unu punkto.” ([J. Arbuthnot,] „An Enquiry into the Connection between the Price of Provisions, and the Size of Farms etc.” By a Farmer, Londono, 1773, p. 12) Tiu skribaĵo estas tre interesa. Oni povas studi en ĝi la genezon de la „kapitalista farmisto” aŭ „komerca farmisto” <„capitalist farmer” aŭ „merchant farmer”>, kiel li estas eksplicite nomata, kaj aŭskulti lian memgloradon kompare kun la „malgrandaj farmistoj” <„small farmers”>, kiu zorgas esence pri sia vivtenado. „La kapitalista klaso estas unue liberigita parte kaj fine tute el la neceso de manlaboro.” („Textbook of Lextures on the Polit. Economy of Nations”. By the Rev. Richard Jones, Hertford, 1852, Lecture III, p. 39)

261La molekula teorio disvolvita de Laurent kaj Gerhardt kaj aplikata en la moderna ĥemio baziĝas sur la sama leĝo. <Eldono al la 3-a eldono:> – Ni rimarkigas por klarigi tiun por la neĥemiisto sufiĉe malklaran rimarkon, ke la aŭtoro parolas ĉi tie pri la de C. Gerhardt unue malkovritaj tiel nomataj „homologaj vicoj” de hidrokarbonaj kombinaĵoj, el kiuj ĉiu havas propran algebran konsist-formulon. Tiel la vico de la parafinoj: $C_nH_{2n+2}$; tiu de la normalaj alkoholoj: $C_nH_{2n+2}$; tiu de la normalaj grasacidoj: $C_nH_{2n}O_2$ kaj multaj aliaj. En la supraj ekzemploj per simpla kvanta aldono de CH2 al la molekula formulo ĉiufoje konsistiĝas kvalite diversa korpo. Pri la partopreno de Laurent kaj Gerhardt – trotaksita de Markso – en la konstato de tiu grava fakto kp Kopp, „Entwicklung der Chemie”, Munkeno, 1873, p. 709 kaj 716, kaj Schorlemmer, „Rise and Progress of Organic Chemistry”, Londono, 1879, p.

La minimumo de la valorsumo pri kiu la unuopa mon- aŭ var-posedanto devas disponi por metamorfoziĝi en novan kapitaliston, ŝanĝiĝas laŭ la diversaj evoluŝtupoj de la kapitalisma produktado kaj estas, ĉe donita evoluŝtupo, diversa en la diversaj industrioj, laŭ iliaj apartaj teĥnikaj kondiĉoj. Iuj industrioj bezonas jam en la komenco de la kapitalisma produktado minimumon da kapitalo kiu ankoraŭ ne troviĝas en la mano de unuopaj individuoj. Tio kondukas parte al ŝtataj monhelpoj al tiaj privatuloj, kiel en Francio tempe de Colbert kaj kiel en pluraj germanaj ŝtatoj ĝis en la nuna epoko, parte al starigo de societoj kun leĝa monopolo por funkciigo de iuj industriaj kaj komercaj branĉoj[262] – la antaŭuloj de la modernaj akcisocietoj.

***

Ni ne pritraktos ĉi tie la detalojn de la ŝanĝoj en la rilato de kapitalisto kaj dunglaboristo kiuj okazis en la evoluo de la produktadprocezo, do ankaŭ ne la pluajn kondiĉojn de la kapitalo mem. Ni emfazu ĉi tie nur kelkajn ĉefajn punktojn.

Ene de la produktadprocezo la kapitalo disvolviĝis al komando super la laboro, t.e. super la aganta laborforto aŭ la laboristo mem. La personigita kapitalo, la kapitalisto, zorgas ke la laboristo plenumu sian laboron laŭorde kaj kun la necesa grado de intenseco.

La kapitalo disvolviĝis krome al trudrilato, kiu devigas la laboristan klason plenumi pli da laboro ol la limigita kunteksto de ĝiaj vivbezonoj preskribis. Kaj kiel produktisto de fremda labor-agado, kiel elpumpisto de plusvaloro kaj ekspluatisto de laborforto ĝi superas je energio, senmezureco kaj efikeco ĉiujn antaŭajn produktad-sistemojn bazitajn sur rekta trudlaboro.

La kapitalo unue subordigas la laboron al si kun la teĥnikaj kondiĉoj kiujn ĝi historie renkontas. Ĝi do ne tuj ŝanĝas la produktadmanieron. La produktado de plusvaloro en la ĝis nun konsiderata formo, per simpla longigo de la labortago, prezentiĝis do sendependa de ĉia ŝanĝo de la produktadmaniero. Ĝi estis ne malpli efika en la malmoderna bakejo ol en la moderna kotonŝpinejo.

Se ni konsideris la produktadprocezon el la vidpunkto de la laborprocezo, la laboristo rilatis al la produktadrimedoj ne kiel al kapitalo, sed kiel al nura rimedo kaj materialo de sia laŭcela produktanta agado. En tanejo

54. – F. E.

262 Marteno Lutero nomas tiajn instituciojn „la societo Monopolia”.

ekz-e li pritraktis la felojn kiel sian nuran laborobjekton. Ne estas la kapitalisto al kiu li tanas la felon. Alia afero, kiam ni rigardis la produktadprocezon el la vidpunkto de la plivaloriga procezo. La produktadrimedoj transformiĝis tuj en rimedojn por ensuĉado de fremda laboro. Jam ne estas la laboristo kiu uzas la produktadrimedojn, sed estas la produktadrimedoj kiuj uzas la laboriston. Anstataŭ esti konsumataj kiel materiaj elementoj de lia produktanta agado, ili konsumas lin kiel fermenton de sia propra vivprocezo, kaj la vivoprocezo de la kapitalo konsistas nur en sia moviĝo mem kiel mem plivaloriĝanta valoro. Fandfornoj kaj laborkonstruaĵoj, kiuj nokte ripozas kaj ne ensuĉas vivan laboron, estas „pura perdo” („mere loss”) por la kapitalisto. Pro tio fandfornoj kaj laborkonstruaĵoj konstistigas „rajton je noktlaboro” de la laborfortoj. La nura transformiĝo de mono en konkretajn faktorojn de la produktadprocezo, en produktadrimedojn, transformas tiujn en rajtajn titolojn kaj trudtitolojn je fremdaj laboro kaj pluslaboro. Kiel tiu inversigo, eĉ deŝovo de la rilato de morta kaj viva laboro, de valoro kaj valorkrea forto, propra al la kapitalisma produktado kaj ĝin karakterizanta, speguliĝas en la konscio de la kapoj de la kapitalistoj, tion montru fine ankoraŭ ekzemplo. Kun la ribelo de la anglaj fabrikestroj de 1848-1850,

> „la ĉefo de la lin- kaj konton-ŝpinejo en Paisly, unu el la plej malnovaj kaj plej respektataj firmaoj de okcidenta Skotlando, de la kompanio Carlile, Filoj kaj K-io, kiu ekzistas de 1752 kaj estas gvidata tra generacioj de la sama familio” –

do tiu eksterordinare inteligenta sinjoro verkis en la Glasgow Daily Mail de la 25-a de aprilo 1849 leteron[263] sub la titolo „La relajsosistemo”, en kiu troviĝas i.a. jena groteska naivaĵo:

> „Ni konsideru nun la malbonaĵojn kiuj fluas el reduktado de la labortempo de 12 al 10 horoj … Ili amasiĝas al la plej serioza damaĝo de la perspektivoj kaj de la proprieto de la fabrikisto. Se li” (t.e. liaj „manoj”) „laborus 12 horojn kaj estus limigita al 10, tiam po 12 maŝinoj aŭ ŝpiniloj ŝrumpas al 10 (then every 12 machines or spindles, in his establishment, shrink to 10), kaj se li volus vendi sian fabrikon, tiam ili estus taksataj nur kiel 10, tiel ke ĉiu fabriko en la tuta lando perdus sesonon de sia valoro.”[264]

263 „Reports of Insp. of Fact. for 30th April 1849”, p. 59

264 saml., p. 60. La fabrikinspektisto Stuart, mem skoto, kaj kontraste al la anglaj fabrikinspektistoj tute kaptita en kapitalista pensmaniero, rimarkigas eksplicite ke tiu letero, kiun li enigas en sian raporton, „estas la plej utila mesaĝo kiun iu ajn el la fabrik-proprietuloj, kiuj aplikas la relajsosistemon, donis al tiuj engaĝitaj en la sama komerco, kaj kiu ĉefe celas forigi la antaŭjuĝojn kaj skrupulojn pri ia ajn ŝanĝo en la aranĝo de laborhoroj.” [laŭ la angla versio.

Por tiu okcidentskota burĝa cerbo, heredanto de akumulitaj kapitalistaj kvalitoj de „kvar generacioj”[265], la valoro de la produktadrimedoj, ŝpiniloj ktp, tiom kunfandiĝas kun la eco de kapitalo engluti fremdan senpagan laboron, ke la ĉefo de la firmao Carlile kaj K-io efektive kredas ke ĉe vendo de lia fabriko oni pagus al li ne nur la valoron de la ŝpiniloj, sed krome ilian plivalorigon, ne nur la laboron kiu troviĝas en ili kaj kiu necesas por la produktado de samspecaj ŝpiniloj, sed ankaŭ la pluslaboron kiun ili helpas elpumpi por la brava okcidenta skoto de Paisly, kaj ĝuste pro tio li pensas ke kun la mallongigo de la labortago je du horoj la vendoprezo de po 12 ŝpinmaŝinoj ŝrumpus al tiu de po 10!

-vl]

265 Vortumo laŭ la angla eldono. -vl

# KVARA SEKCIO – La produktado de la relativa plusvaloro

## *DEKA ĈAPITRO Nocio de la relativa plusvaloro*

Tiu parto de la labortago, kiu produktas nur ekvivalenton por la valoro de la laborforto pagita de la kapitalo, estis ĝis nun konsiderata de ni kiel konstanta grando, kiu ĝi fakte estas sub donitaj produktadkondiĉoj, sur ekzistanta ekonomia evoluŝtupo de la socio. Trans tiu necesa labortempo la laboristo povis labori 2, 3, 4, 6 ktp horojn. Sed de la grando de tiu longigo dependas la kvoto de la plusvaloro kaj la grando de la labortago. Se la necesa labortempo estis konstanta, tiam male la tuta labortago estis varia.

Ni supozu nun labortagon, kies grando kaj kies dispartigo en necesa laboro kaj pluslaboro estas donitaj. La linio ac, a__________b__c, prezentu ekz-e dekduhoran labortagon, la parto a_b 10 horojn da necesa laboro, la parto bc 2 horojn da pluslaboro. Kiel la produktado de plusvaloro estas nun grandigebla, t.e. la pluslaboro longigebla, sen ĉia kroma longigo aŭ sendepende de ĉia kroma longigo de ac?

Malgraŭ donitaj limoj de la labortago ac, bc ŝajnas longigebla, se ne per longigo trans ĝia finpunkto c, kiu estas samtempe la finpunkto de la labortago ac, tamen per deŝovo de ĝia komencpunkto b en mala direkto, al a. Ni supozu, ke b'b en a_________b'_b__c egalas al la duono de bc aŭ al unu laborhoro. Se nun en la dekduhora labortago ac la punkto b ŝoviĝas al b', tiam bc etendiĝas al b'c, la pluslaboro kreskas duone, de 2 horoj al 3 horoj, kvankam la labortago kiel antaŭe havas nur 12 horojn. Sed tiu etendado de la pluslaboro de bc al b'c, de 2 horoj al 3 horoj, estas evidente malebla sen samtempa kunpremado de la necesa laboro de ab al ab', de 10 al 9 horoj. La longigo de la pluslaboro estus proporcia al la mallongigo de

la necesa laboro, aŭ parto de la labortempo kiun la laboristo konsumas ĝis nun fakte por si mem, transformiĝas en labortempon por la kapitalisto. Kio ŝanĝiĝus, estus ne la longo de la labortago, sed ties divido en necesa laboro kaj pluslaboro.

Aliflanke la grando de la pluslaboro estas evidente mem donita per donita grando de la labortago kaj donita valoro de la laborforto. La valoro de la laborforto, t.e. la labortempo necesa por ĝia produktado, determinas la labortempon necesan por la reproduktado de ĝia valoro. Se laborhoro reprezentiĝas en orkvanto de duona ŝilingo aŭ 6 d., kaj se la tagvaloro de la laborforto estas 5 ŝ., tiam la laboristo devas ĉiutage labori 10 horojn por kompensi la tagvaloron de sia laborforto pagitan al li de la kapitalo aŭ produkti ekvivalenton por la valoro de siaj necesaj ĉiutagaj vivrimedoj. Kun la valoro de tiuj vivrimedoj, la valoro de lia laborforto[1] estas donita, per la valoro de lia laborforto, la grando de lia necesa labortempo. Sed la grandon de la pluslaboro oni ricevas per subtraho de la necesa labortempo el la tuta labortago. Dek horoj subtrahitaj el dekdu rezultigas du, kaj ne videblas kiel la pluslaboro sub la donitaj kondiĉoj plilongigeblas trans du horoj. Tamen la kapitalisto povas pagi al la laboristo, anstataŭ 5 ŝilingoj nur 4 ŝilingojn 6 d. aŭ eĉ malpli. Por reproduktado de tiu valoro de 4 ŝ 6 d. sufiĉus 9 laborhoroj, el la dekduhora labortago, kaj la pluslaboro altiĝus tiam de du al tri horoj, de sesono al kvarono, kaj la plusvaloro mem de 1 ŝ. al 1 ŝ. 6 d. Sed tiu rezulto atingeblus nur per premo de la laborista salajro sub la valoron de lia laborforto. Per la 4 ŝ 6 d., kiujn li produktas en 9 horoj, li disponas pri dekono da vivrimedoj malpli ol antaŭe, kaj tiel okazas nur „kripla” reproduktado de lia laborforto. La pluslaboro estus tie longigita nur per transiro trans ĝiaj normalaj limoj *bc*, ĝia kampo etendita per ŝtela derompo el la kampo de la necesa labortempo.

1 La valoro de la taga mezuma salajro estas determinita de tio kion la laboristo bezonas „por vivi, labori kaj generi idojn”. (William Petty, „Political Anatomy of Ireland”, 1672, p. 64) „La prezo de la laboro estas ĉiam determinata de la prezo de la necesaj vivrimedoj.” La laboristo ne ricevas la salajron kongruan kun tio, „ĉiam kiam … la salajro de la laboristo ne sufiĉas por nutri tiom grandan familion kia estas la sorto de multaj el ili, laŭ lia malalta nivelo kaj kiel laboristo”. (J. Vanderlint, l.c., p. 15) „La simpla laboristo, kiu posedas nenion ol siajn brakojn kaj sian diligenton, havas nenion, krom se li sukcesas vendi sian laboron al aliuloj … Ĉe la laboro devas fine okazi, kaj fakte okazas, ke la salajro de la laboristo estas limigita al tio, kion li nepre bezonas por sia vivtenado.” (Turgot, „Réflexions etc.”, „Oeuvres”, éd. Daire, vol. I, p. 10) „La prezo de la vivrimedoj estas fakte egala al la kostoj de la produktado de la laboro.” (Malthus, „Inquiry into etc. Rent”, Londono, 1815, p. 48, noto)

Malgraŭ la grava rolo kiun tiu metodo ludas en la reala moviĝo de la salajro, ĝi estu ĉi tie ekskludita per la supozo ke la varoj, do ankaŭ la laborforto, estas aĉetataj kaj vendataj je sia plena valoro. Kun tiu supozo, la labortempo necesa por produktado de la laborforto aŭ por reproduktado de ĝia valoro povas malpliiĝi, ne ĉar la salajro de la laboristo malaltiĝas sub la valoro de lia laborforto, sed nur kiam tiu valoro mem malpliiĝas. Ĉe donita longo de la labortago la longigo de la pluslaboro devas fonti el la mallongigo de la necesa labortempo, ne inverse la mallongigo de la necesa labortempo el la longigo de la plusvaloro. En nia ekzemplo la valoro de la laborforto devas vere sinki je dekono, por ke la necesa labortempo malpliiĝu je dekono, de 10 al 9 horoj, kaj pro tio la pluslaboro longiĝu de 2 al 3 horoj.

Sed tia malaltiĝo de la valoro de la laborforto je dekono kondiĉas siaflanke ke la sama kvanto da vivrimedoj, kiuj estis antaŭe produktata en 10, nun produktiĝas en 9 horoj. Tio estas tamen malebla sen altigo de la produktadforto de la laboro. Per donitaj rimedoj, ŝuisto ekz-e povas fari paron da botoj en unu labortago de 12 horoj. Se li devas en la sama tempo fari du parojn da botoj, tiam la produktadforto de lia laboro devas duobliĝi, kaj ĝi ne povas duobliĝi sen ŝanĝo en liaj laborrimedoj aŭ en lia labormetodo aŭ en ambaŭ samtempe. Do, devas okazi revolucio en la produktadkondiĉoj de lia laboro, t.e. en lia produktadmaniero kaj pro tio en lia laborprocezo mem.

Sub altigo de la produktadforto de la laboro ni komprenas ĉi tie ĝenerale ŝanĝon en la laborprocezo, per kiu la labortempo socie necesa por produktado de varo estas mallongigita, per kiu do pli malgranda kvanto da laboro akiras la forton produkti pli grandan kvanton da uzvaloro.[2] Do, dum ĉe la produktado de la plusvaloro en la ĝis nun konsiderata formo la produktadmaniero estis supozata kiel donita, por la produktado de plusvaloro per transformado de necesa laboro en pluslaboron tute ne sufiĉas ke la kapitalo alproprigas la laborprocezon en ties historie tradiciita aŭ ekzistanta formo kaj nur longigas ĝian daŭron. Ĝi devas revolucii la teĥnikajn kaj sociajn kondiĉojn de la laborprocezo, do la produktadmanieron mem, por altigi la produktivon[3] de la laboro, malaltigi la

2 „Se la metioj perfektiĝas, tio signifas nenion alian ol la malkovron de novaj manieroj per kiuj produkto fareblas per malpli da homoj aŭ (kio estas la samo) en pli mallonga tempo ol antaŭe." (Galiani, l.c., p. 158, 159) „La ŝparo de produktadkostoj povas esti nenio alia ol ŝparo de labortempo aplikata al la produktado." (Sismondi, „Études etc.", vol. I, p. 22)

3 Mi uzas „produktivo" ĉi tie kaj en la sekvo en la senco de „produktadkapab-

valoron de la laborforto per altigo de la produktivo de la laboro kaj tiel mallongigi la parton de la labortago necesan por la reproduktado de tiu valoro.

Plusvaloron produktatan per longigo de la labortago mi nomas *absoluta plusvaloro*; la plusvaloron, male, kiu fontas el mallongigo de la necesa labortempo kaj laŭproporcia ŝanĝo de la proporcio inter la du konsistigaj partoj de la labortago – *relativa plusvaloro*.

Por malaltigi la valoron de la laborforto, la altigo de la produktivo devas atingi industribranĉojn kies produktoj determinas la valoron de la laborforto, do industriojn kiuj liveras la varojn kutime necesajn por vivtenado de la laboristo aŭ la produktadrimedojn de tiuj varoj aŭ varojn kiuj povas anstataŭi ilin.[4] Sed la valoro de varo estas determinata ne nur de la kvanto da laboro kiu donas al ĝi la lastan formon, sed same ankaŭ de la laborkvanto entenata en ĝiaj produktadrimedoj. Ekz-e la valoro de boto determiniĝas ne nur de la ŝuista laboro, sed ankaŭ de la valoro de ledo, peĉo, ŝnuro ktp. Altigo de la produktadforto kaj proporcia malkarigo de la varoj en la industrioj kiuj liveras la materiajn elementojn de la konstanta kapitalo, la laborrimedojn kaj la labormaterialon, por produktado de la necesaj vivrimedoj, do ankaŭ malaltigas la valoron de la laborforto. Sed male, en la produktadbranĉoj, kiuj liveras nek necesajn vivrimedojn nek produktadrimedojn por ties produktado, la altigita produktivforto tute ne tuŝas la valoron de la laborforto.

La malpli kosta varo malaltigas la valoron de la laborforto kompreneble nur en tio, do nur en la proporcio laŭ kiu ĝi eniras la reproduktiĝon de la laborforto. Ĉemizoj ekz-e estas necesa vivrimedo, sed nur unu el multaj. Ilia malplikostigo malaltigas nur la elspezojn de la laboristo por ĉemizoj. Sed la ĉioma sumo de la necesaj vivrimedoj konsistas el diversaj varoj, kiuj ĉiuj estas produktoj de apartaj industrioj, kaj la valoro de ĉiu tia varo konsistigas proporcian parton de la valoro de la laborforto. La valoro de la laborforto malkreskas kun tiu de la labortempo necesa por ĝia reproduktado, ĝia suma mallongigo egalas al la sumo de ĉiuj mallongigoj en ĉiuj ĉi specialaj produktadbranĉoj. Ni pritraktas tiun ĝeneralan rezulton ĉi tie, kvazaŭ ĝi estus rekta rezulto kaj rekta celo en ĉiu unuopa kazo. Se unuopa kapitalisto per altigo de la laborproduktivo malkostigas ekz-e ĉemizojn, tiam li tute ne necese celas malaltigi la valoron de la laborforto kaj per tio la proporcie necesan labortempon, sed nur en tio ke li fine

lo", „produktadforto", kaj „laborproduktivo" do en la senco de „produktadforto de la laboro". -vl

4 Formulado de tiu frazo konsidere ankaŭ al la franca eldono. -vl

kontribuas al tiu rezulto, li kontribuas al la altigo de la ĝenerala kvoto de plusvaloro.[5] Oni devas distingi la ĝeneralajn kaj necesajn tendencojn de la kapitalo disde iliaj aperformoj.

Ĉi tie ni ne konsideru nun, kiel la imanentaj leĝoj de la kapitalisma produktado speguliĝas en la ekstera moviĝo de la individuaj kapitaloj, montriĝas kiel devigaj leĝoj de la konkurenco kaj pro tio trudiĝas en la konscio de la individua kapitalisto kiel agmotivoj. Sed tio estu jam dekomence klara: Scienca analizo de la konkurenco eblas nur, ekde kiam la interna naturo de la kapitalo estas komprenita, same kiel la ŝajna moviĝo de la astroj estas komprenebla nur al tiu, kiu konas ilian realan, sed sense ne percepteblan moviĝon. Tamen, por kompreni la produktadon de la relativa plusvaloro kaj nur surbaze de la rezultoj ĝis ĉi tie jam atingitaj en niaj klarigoj, ni aldonu jenajn rimarkojn:

Se laborhoro reprezentiĝas en orkvanto de 6 d aŭ duona ŝilingo, tiam en dekduhora labortago produktiĝas valoro de 6 ŝilingoj. Ni supozu, ke kun la donita produktivo de la laboro produktiĝas 12 pecoj da varoj en tiuj 12 laborhoroj. La valoro de la produktadrimedoj, krudmaterialo ktp foruzataj en ĉiu peco estu 6 d. En tiuj cirkonstancoj la unuopa varo kostas 1 ŝ., nome 6 d. por la valoro de la produktadrimedoj, 6 d. por la valoro aldonita en ilia prilaborado. Ni supozu nun ke kapitalisto sukcesas duobligi la produktivon de la laboro kaj do produkti 24 anstataŭ 12 pecojn de tiu varspeco en la dekduhora labortago. Ĉe senŝanĝa valoro de la produktadrimedoj la valoro de la unuopa varo falas nun al 9 d., nome 6 d. por la valoro de la produktadrimedoj, 3 d. por la valoro aldonita per la lasta laboro. Malgraŭ la duobligita produktivo, la labortago nun kiel antaŭe produktas nur novan valoron de 6 ŝ., tiu tamen dividiĝas nun sur duoble multaj produktoj. Ĉiu unuopa produkto ricevas do jam nur $^1/_{24}$ anstataŭ $^1/_{12}$ de la ĉiomvaloro, 3 d. anstataŭ 6 d. aŭ, kio estas la samo: anstataŭ unu horo, jam nur duona horo da laboro estas aldonata al la produktadrimedoj dum ilia transformado en produkton kalkulatan laŭpece. La individua valoro de tiu varo staras nun sub ĝia socia valoro, t.e. ĝi kostas malpli da labortempo ol la granda amaso de la samaj artikloj, produktitaj sub la sociaj mezumaj kondiĉoj. La peco kostas mezume 1 ŝ. aŭ reprezentas 2 horojn da socia laboro; kun la ŝanĝita produktadmaniero ĝi kostas nur 9 d. aŭ entenas nur $1^1/_2$ laborhorojn.

5 „Se la fabrikisto per plibonigo de la maŝinaro duobligas siajn produktojn … li gajnas (fine) nur en tio ke li estas kapabligita pli malmultekoste vesti la laboriston … kaj ke per tio malpli granda parto de la ĉioma enspezo estas por la laboristo.” (Ramsay, saml., 168, 169)

Sed la reala valoro de varo estas ne ĝia individua, sed ĝia socia valoro, do ĝi ne estas mezurata laŭ la labortempo kiun ĝi kostas en la unuopa kazo al la produktisto, sed laŭ la labortempo socie necesa por ĝia produktado. Do, se la kapitalisto, kiu aplikas la novan metodon, vendas sian varon je ĝia socia valoro de 1 ŝ., tiam li vendas ĝin je 3 d. super ĝia individua valoro kaj tiel realigas kroman plusvaloron de 3 d. Sed aliflanke la 12-hora labortago prezentiĝas al li nun en 24 pecoj da varo anstataŭ kiel antaŭe en 12. Do, por vendi la produkton de labortago, li bezonas duoblan vendkapablon aŭ duoble pli grandan merkaton. Kun alie senŝanĝaj cirkonstancoj liaj varoj konkeras pli grandan merkatspacon nur per malpliiĝo de iliaj prezoj. Li vendos ilin do super ilia individua, sed sub ilia socia valoro, ekz-e je po 10 d. por ĉiu peco. Tiel li ricevas el ĉiu individua peco ankoraŭ kroman plusvaloron de 1 d. Tiu pliiĝo de la plusvaloro okazas por li sendepende ĉu jes aŭ ne lia varo apartenas al la necesaj vivrimedoj kaj per tio eniras kiel determinanto en la ĝeneralan valoron de la laborforto. Do, sendepende de tiu lasta cirkonstanco, por ĉiu unuopa kapitalisto ekzistas la motivo malplikostigi la varon per altigo de la produktivo de la laboro.

Tamen, eĉ en tiu kazo, la kresko de la plusvaloro venas el la mallongigo de la necesa labortempo kaj de la proporcia longigo de la kromlaboro.[6] Ni supozu ke la necesa labortempo estas 10 horoj aŭ la tagvaloro de laborforto 5 ŝ., la pluslaboro 2 horoj, la tage produktata plusvaloro do 1 ŝ. Sed nia kapitalisto produktas nun 24 pecojn, kiujn li vendas je po 10 d. aŭ kune je 20 ŝ. Ĉar la valoro de la produktadrimedoj estas 12 ŝilingoj, $14^2/_5$ pecoj da varo kompensas nur la antaŭpagitan konstantan kapitalon. La dekduhora labortago reprezentiĝas en la restantaj $9^3/_5$ pecoj. Ĉar la prezo de la laborforto estas 5 ŝ., en la produkto de 6 pecoj reprezentiĝas la necesa labortempo kaj en $3^3/_5$ pecoj la pluslaboro. La proporcio de la necesa laboro al pluslaboro, kiu sub la sociaj mezumaj kondiĉoj estis 5 : 1, estas nun jam nur 5 : 3.

La saman rezulton oni ricevas jene: La produktvaloro de la dekduhora labortago estas 20 ŝ. El tiuj, 12 ŝ. apartenas al la nur reaperanta valoro de la produktadrimedoj. Restas do 8 ŝ. Tiu monesprimo estas pli alta ol la monesprimo de la socia mezuma laboro de la sama speco, en kiu 12 horoj

6 „La profito de homo dependas ne de lia komando super la produkto de aliies laboro, sed de lia komando super laboro mem. Se li povas vendi siajn varojn je pli alta prezo, dum la salajroj de liaj laboristoj restas senŝanĝaj, li evidente tiras profiton el tio … Malpli granda parto de tio, kion li produktas, sufiĉas por ekmovi tiun laboron, kaj laŭ tio restas al li pli granda parto." ([J. Cazenove,] Outlines of Polit. Econ., Londono, 1832, p. 49, 50.)

esprimiĝas en 6 ŝ. La laboro de escepta produktivo efikas kiel potencigita laboro aŭ kreas en la samaj tempospacoj pli altajn valorojn ol la socia mezuma laboro de la sama speco. Sed nia kapitalisto pagas nun kiel antaŭe nur 5 ŝ. por la tagvaloro de la laborforto. La laboristo bezonas do, anstataŭ antaŭe 10, nun jam nur $7^1/_2$ horojn por reprodukti tiun valoron. Lia pluslaboro kreskas do je $2^1/_2$ horoj, la plusvaloro kreita de li de 1 al 3 ŝ.

La kapitalisto, kiu aplikas la pli bonan produktadmanieron, alproprigas al si do pli grandan parton de la labortago por pluslaboro ol la ceteraj kapitalistoj en la sama produktado. Li faras individue tion, kion la kapitalisto ĉe produktado de la relativa plusvaloro faras ĝenerale. Sed aliflanke tiu kroma plusvaloro malaperas ekde kiam la nova produktadmaniero ĝeneraliĝas, kaj per tio la diferenco inter la individua valoro de la pli malmultekoste produktataj varoj kaj ilia socia valoro malaperas.

La sama leĝo de la determinado de la valoro per la labortempo, kiu sentiĝas al la kapitalisto kun la nova metodo en la formo ke li devas vendi sian varon sub ĝia socia valoro, pelas liajn konkurantojn, kiel deviga leĝo de la konkurenco, al enkonduko de la nova produktadmaniero.[7] La ĝenerala kvoto de la plusvaloro estas fine tuŝata de la tuta procezo nur kiam la altigo de la produktivo de la laboro atingis tiujn produktobranĉojn, do malplikostigis tiujn varojn, kiuj eniras la rondon de la necesaj vivrimedoj, kiuj do konsistigas elementojn de la valoro de la laborforto.

La valoro de la varoj staras en inversa proporcio al la produktivo de la laboro, kaj same al la valoro de la laborforto, ĉar tiu estas determinata de varvaloroj. La relativa plusvaloro, male, staras en rekta proporcio al la produktivo de la laboro. Ĝi kreskas kun kreskanta kaj falas kun falanta produktivo. Socie mezuma labortago de 12 horoj, kun supozata senŝanĝa monvaloro, produktas ĉiam la saman valorprodukton de 6 ŝ., kiom ajn tiu valorsumo dividiĝas inter ekvivalento por la valoro de la laborforto kaj la plusvaloro. Sed se pro kreskinta produktivo la valoro de la ĉiutagaj vivrimedoj kaj do la tagvaloro de la laborforto falas de 5 ŝ. al 3 ŝ., tiam la

7 „Se mia najbaro povas vendi malmultekoste, per tio ke li produktas per malmulte da laboro multon, mi devas strebi vendi same malmultekoste kiel li. Tiel ĉiu arto, ĉiu procedo aŭ ĉiu maŝino, kiu laboras per la laboro de malmultaj manoj kaj sekve pli malmultekoste, kreas ĉe la aliaj devigon kaj konkuron apliki la saman arton, la saman proceduron aŭ maŝinon, aŭ inventi ion similan, por ke ĉiuj estu sur la sama nivelo kaj ke neniu povu vendi sub la prezo de la aliaj." (The Advantages of the East-India Trade to England, Londono, 1720, p. 67)

plusvaloro de 1 ŝ. kreskas al 3 ŝ. Pro reprodukti la valoron de la laborforto, necesis 10 kaj necesas nun jam nur 6 laborhoroj. Kvar laborhoroj liberiĝis kaj do anekseblas por la flanko de pluslaboro. La kapitalo havas do imanentan strebon kaj konstantan tendencon altigi la laborproduktivon por malaltigi la prezon de la varoj – kaj sekve – tiun de la laboristo.[8]

La absoluta valoro de la varo, konsiderata por ĝi mem, estas por la kapitalisto, kiu produktas ĝin, tute indiferenta. Lin interesas nur la plusvaloro kiu troviĝas en ĝi kaj kiu realiĝas en ĝia vendo. Realigado de plusvaloro aŭtomate inkludas anstataŭigon de la antaŭpagita valoro. Ĉar la relativa plusvaloro kreskas en rekta proporcio kun la evoluo de la produktivo de la laboro, dum la valoro de la varoj falas en inversa proporcio al la sama evoluo, ĉar do la sama identa procezo malplikostigas la varojn kaj kreskigas la plusvaloron entenatan en ili, la enigmo solviĝas, ke la kapitalisto, kiu zorgas nur pri la produktado de interŝanĝvaloro, konstante strebas malpliigi la interŝanĝvaloron de la varoj. Per tiu kontraŭdiro unu el la fondintoj de la politika ekonomio, Quesnay, turmentis siajn kontraŭulojn, kiuj ne sciis respondi al li.

> „Vi koncedas”, diras Quesnay, „ke, ju pli oni povas, sen malavantaĝo por la produktado, ŝpari kostojn aŭ multekostajn laborojn en la fabrikado de industriaj produktoj, des pli avantaĝa estas tiu ŝparo, ĉar ĝi malpliigas la prezon de la produktoj. Tamen, vi kredas ke la produktado de riĉaĵo, kiu rezultas el la laboro de la metiistoj, konsistas el altigo de la vendvaloro de iliaj produktoj.”[9]

8 „En kiu ajn proporcio la elspezoj de la laboristoj estas malpliigitaj, en la sama proporcio ankaŭ lia salajro malpliiĝos, se la limigoj al la industrio estas samtempe nuligitaj.” (Considerations concerning taking off the Bounty on Corn exported etc., Londono, 1753, p. 7) „La intereso de la industrio postulas ke greno kaj ĉiuj vivrimedoj estu kiom eble plej malmultekostaj; kio ajn plikostigas ilin, tio devas plikostigi ankaŭ la laboron … en ĉiuj landoj, en kiuj la industrio ne estas submetita al limigoj, la prezo de la vivrimedoj devas efiki sur la prezon de la laboro. Tiu estos ĉiam malpliigita, kiam la necesaj vivrimedoj fariĝas malpli kostaj.” (saml., p. 3) „La salajroj estas malaltigataj en la sama proporcio laŭ kiu la produktadfortoj kreskas. La maŝino ja malplikostigas la necesajn vivrimedojn, sed ĝi krome malplikostigas la laboriston.” (A Prize Essay on the comparative merits of Competition and Cooperation, Londono, 1834, p. 27)

9 „Vous convenez, disait-il, que plus on peut, sans préjudice, épargner de frais ou de travaux dispendieux dans la fabrication des ouvrages des artisans, plus cette épargne est profitable par la diminution des prix des ouvrages. Cependant, vous croyez que la production de richesse qui résulte des travaux des artisans consiste dans l'augmentation de la valeur vénale de leurs ouvrages” (Quesnay: Dialogue sur le commerce et les travaux des artisans, (eld. Daire), p. 188, 189.)

Ŝparado de laboro[10] per disvolvado de la produktivo de la laboro[11] celas en la kapitalisma produktado do tute ne mallongigon de la labortago. Ĝi celas nur la mallongigon de la labortempo necesa por produktado de certa varkvanto. La fakto ke la laboristo ĉe kreskinta produktivo de sia laboro produktas en unu horo ekz-e dekoble pli da varo ol antaŭe, do bezonas por ĉiu peco da varo dekoble malpli da labortempo, tute ne malhelpas laborigi lin nun kiel antaŭe dum 12 horoj kaj igi lin produkti en la 12 horoj 1.200 anstataŭ antaŭe 120 pecojn. Lia labortago povas samtempe esti eĉ longigita, tiel ke li produktas nun en 14 horoj 1.400 pecojn ktp. Oni povas do legi ĉe ekonomikistoj tiaj kiaj MacCulloch, Ure, Senior kaj tiom da aliaj, sur unu paĝo ke la laboristo ŝuldas al la kapitalo dankon pro tiu disvolvado de la produktivfortoj, ĉar ĝi mallongigas la necesan labortempon, kaj sur la sekva paĝo, ke li devas pruvi tiun dankemon per tio ke li estonte laboru dum 15 anstataŭ 10 horoj.

La disvolvado de la produktivo de la laboro, ene de la kapitalisma produktado, celas mallongigi la parton de la labortago, kiun la laboristo devas labori por si mem, por ĝuste per tio longigi la alian parton de la labortago, kiun li povas labori senpage por la kapitalisto. En kiu mezuro tiu rezulto atingeblas ankaŭ sen malplikostigo de la varoj, tio montriĝos en la apartaj produktadmetodoj de la relativa plusvaloro, kiujn ni en la sekvo analizos.

## *DEKUNUA ĈAPITRO Kunlaborado*

La kapitalisma produktado komenciĝas, kiel ni vidis, efektive nur tie, kie la sama individua kapitalo dungas pli grandan nombron da laboristoj samtempe, kie la laborprocezo grandigas do sian amplekson kaj liveras

10 En la originalo: „Ökonomie der Arbeit”, („Ekonomio de la laboro”). -vl

11 „Tiuj spekulistoj, kiuj tiom ŝparas je la laboro de la laboristoj, kiun ili devus pagi.” (J. N. Bidaut: „Du Monopole qui s'établit dans les arts industriels et le commerce”, Parizo, 1828, p. 13) „La entreprenisto ĉiam faros ĉion por ŝpari tempon kaj laboron.” (Dugald Stewart, „Works”, ed. by Sir W. Hamilton, v. VIII, Edinburgo, 1855, „Lectures on Polit. Econ.”, p. 318) „Ili” (la kapitalistoj) „interesiĝas pri tio ke la produktadfortoj de la laboristoj, kiujn ili dungas, estu kiom eble plej altaj. Kreskigi tiun forton, al tio ilia atento estas, kaj preskaŭ ekskluzive, direktita.” (R. Jones, saml., Lecture III.)

produkton en pli granda kvanta skalo. La agado de relative granda nombro da laboristoj samtempe, samspace (aŭ, sur la sama laborkampo), por produktado de la sama varspeco, sub la komando de la sama kapitalisto, estas historie kaj nocie la elirpunkto de la kapitalisma produktado. Koncerne la produktadmanieron mem, ni vidas ke ekz-e la manufakturo en siaj komencoj distingiĝas disde la estonta metia industrio apenaŭ alie ol per la pli granda nombro da laboristoj samtempe okupataj de la sama kapitalo. La metiejo de la gilda majstro estas nur ampleksigita.

La diferenco estas unue do nur kvanta. Oni vidis, ke la kvanto de plusvaloro, kiun donita kapitalo produktas, egalas la plusvaloron, kiun la unuopa laboristo liveras, obligite per la nombro da samtempe okupataj laboristoj. Tiu nombro per si mem ŝanĝas neniom la kvoton de la plusvaloro aŭ la ekspluatgradon de la laborforto, kaj koncerne la produktadon de varvaloro entute ĉia kvanta ŝanĝo de la laborprocezo ŝajnas indiferenta. Tio sekvas el la naturo de la valoro. Se dekduhora labortago konkretiĝas en 6. ŝ., tiam 1.200 da tiaj labortagoj en 6 ŝ. oble 1.200. En tiu ĉi kazo 12 x 1.200, en la alia kazo 12 laborhoroj enkorpiĝis en la produktoj. En la valorproduktado, multaj unuoj kalkuliĝas ĉiam nur kiel multaj unuopoj. Por la valorproduktado do ne estas diferenco, ĉu 1.200 laboristoj produktas unuope aŭ kune sub la komando de la sama kapitalo.

Tamen, ene de certaj limoj, okazas modifo. Laboro konkretigita en valoro estas laboro de socie mezuma kvalito, do la esprimiĝo de mezuma laborforto. Sed mezuma grando ekzistas ĉiam nur kiel mezumo de multaj diversaj grandindividuoj de sama speco. En ĉiu industribranĉo la individua laboristo, Petro aŭ Paŭlo, pli aŭ malpli devias de la mezuma laboristo. Tiuj individuaj devioj, kiuj matematike nomiĝas „eraroj”, kompensiĝas kaj malaperas, ekde kiam oni prenas iom pli grandan nombron da laboristoj kune. La fama sofisto kaj sikofanto Edmund Burke volas el siaj praktikaj spertoj kiel farmisto eĉ scii, ke jam *„por tiom malgranda opo”* kia 5 kampservistoj ĉia individua diferenco de la laboro malaperas, do ke iaj ajn anglaj kampservistoj en vira aĝo faras en la sama tempo ĝuste same multan laboron kiel ĉiuj ajn anglaj kampservistoj.[12] Kiel ajn, estas

12 „Sendube ekzistas konsiderinda diferenco inter la valoro de la laboro de iu viro kaj tiu de la laboro de alia, pro malsamaj forto, lerteco kaj honesta diligento. Sed mi estas surbaze de mia skrupula observado tute certa, ke ajnaj kvin viroj en sia tutaĵo liveras la saman kvanton da laboro kiel kvin aliaj, kiuj troviĝas en la menciitaj vivperiodoj. Tio signifas, ke inter tiuj kvin viroj troviĝas iu, kiu havas ĉiujn ecojn de bona laboristo, unu kiu estas malbona laboristo, dum la aliaj tri estas mezumaj kaj proksimiĝas al la unua kaj al la lasta. Tiel oni trovos jam en tiom malgranda grupo da eĉ nur kvin viroj la

klare ke la ĉioma labortago de pli granda nombro da samtempe okupataj laboristoj, dividita per la kvanto da laboristoj, estas per si mem tago de mezuma laboro. Ni supozu ke la labortago de la unuopulo estas dekduhora. Tiam la labortago de 12 samtempe okupataj laboristoj konsistigas ĉiomlabortagon de 144 horoj, kaj kvankam la laboro de ĉiu unuopulo el la dekduo devias pli aŭ malpli de la socie mezuma laboro, la unuopulo do povas bezoni iomete pli aŭ malpli da tempo por la sama faro, la labortago de ĉiu unuopulo posedas kiel dekduono de la ĉiomlabortago de 144 horoj la socian mezumkvaliton. Sed por la kapitalisto, kiu laborigas dekduopon, la labortago ekzistas kiel ĉiomlabortago de la dekduopo. La labortago de ĉiu unuopulo ekzistas kiel proporcia parto de la ĉiomlabortago, tute sendepende de tio ĉu la dekdu laboras de mano en manon aŭ ĉu la tuta kunteksto de iliaj laboroj konsistas nur en tio ke ili laboras por la sama kapitalisto.

Sed se aliflanke el la 12 laboristoj po du estas laborigataj de etmajstro, tiam fariĝas hazarda, ĉu ĉiu unuopa majstro produktas la saman valorkvanton kaj do realigas la ĝeneralan kvoton de plusvaloro. Okazus individuaj devioj. Se laboristo elspezus konsiderinde pli da tempo por produktado de varo ol socie necesan, la por li individue necesa labortempo devius konsiderinde de la socie necesa aŭ mezuma labortempo, tiam lia laboro ne estus konsiderata kiel mezuma laboro, nek lia laborforto kiel mezuma forto; ĝi tute ne vendiĝus aŭ vendiĝus nur sub la mezuma valoro de la laborforto.

Certa minimumo da laborlerteco estas do la kondiĉo, kaj ni vidos poste, ke la kapitalisma produktado trovas rimedojn por mezuri tiun minimumon. Tamen la minimumo devias de la mezumo, kvankam aliflanke la mezuma valoro de la laborforto pagendas. El la ses etmajstroj unu ricevus do malpli ol la ĝeneralan kvoton de plusvaloro. La malsamaĵoj kompensiĝus por la socio, sed ne por la unuopa majstro. La leĝo de la plivalorigo[13] entute realiĝas do por la unuopa produktanto nur komplete se li produktas kiel kapitalisto, laborigas multajn laboristojn samtempe, do dekomence movas socie mezuman laboron.[14]

tutaĵon de tio, kion kvin viroj povas plenumi.” (E. Burke, l.c., 15, 16) Kp Quételet pri la mezuma individuo.

13 En la originalo: „Verwertung” (valorigo), sed fakte temas pli plivalorigo. -vl

14 S-ro profesoro Roscher pretendas esti malkovrinta, ke kudristino, kiu estas laborigata dum du tagoj de la profesoredzino, liveras pli da laboro ol du kudristinoj kiujn la profesoredzino laborigas samtage. La s-ro profesoro ne faru siajn observojn pri la kapitalisma produktadprocezo en la infanĉambro

Ankaŭ ĉe senŝanĝa labormaniero la samtempa aplikado de pli granda kvanto da laboristoj efikas revolucion en la materiaj kondiĉoj de la laborprocezo. Konstruaĵoj, en kiuj laboras multaj, stokejoj por krudmaterialo ktp, ujoj, instrumentoj, aparatoj ktp, kiuj servas al multaj samtempe aŭ alterne, mallonge, parto de la produktadrimedoj estas nun konsumataj komune en la laborprocezo. Unuflanke la interŝanĝvaloro de varoj, do ankaŭ tiu de produktadrimedoj, tute ne altiĝas per pli alta ekspluatado de ilia uzvaloro. Aliflanke la skalo de la komune uzataj produktadrimedoj kreskas. Ĉambro, en kiu laboras 20 teksistoj per siaj 20 teksiloj, devas esti pli granda ol la ĉambro de sendependa teksisto kun du submajstroj. Sed la produktado de 20-persona metiejo kostas malpli da laboro ol tiu de 10 metiejoj je po du personoj, kaj tiel ĝenerale la valoro de amase koncentritaj kaj komunaj produktadrimedoj kreskas ne proporcie kun ilia amplekso kaj ilia uzefiko. Komune uzataj produktadrimedoj transdonas malpli grandan valorparton al la unuopa produkto, parte ĉar la ĉiomvaloro, kiun ili transdonas, dividiĝas samtempe sur pli granda produktkvanto, parte ĉar ili, kompare kun la unuopaj produktadrimedoj, eniras en la produktadprocezon ja kun absolute pli granda, sed, konsidere al ilia efikspaco, kun relative pli malgranda valoro. Per tio malaltiĝas valorparto de la konsistanta kapitalo, do proporcie al ĝia grando ankaŭ la ĉiomvaloro de la varo. La efiko estas la sama kvazaŭ la produktadrimedoj de la varo estus produktitaj malpli koste. Tiu ŝparo en la aplikado de la produktadrimedoj fontas nur el ilia komuna konsumado en la laborprocezo de multaj. Kaj ili ricevas tiun karakteron kiel kondiĉoj de socia laboro aŭ sociaj kondiĉoj de la laboro kontraste al la disaj kaj relative multekostaj produktadrimedoj de unuopaj memstaraj laboristoj aŭ etmajstroj, eĉ se tiuj multaj laboras nur space kune, ne unu kun la alia. Parto de la laborrimedoj akiras tiun socian karakteron, antaŭ ol la laborprocezo akiras ĝin mem.

La ekonomio de la produktadrimedoj konsiderendas entute el duobla vidpunkto. Unuflanke, en la mezuro laŭ kiu ĝi malkarigas varojn kaj per tio malaltigas la valoron de la laborforto. Aliflanke, en la mezuro laŭ kiu ĝi ŝanĝas la proporcion de la plusvaloro al la antaŭpagita ĉiomkapitalo, do al la valorsumo de ties konstantaj kaj variaj partoj. Tiu lasta punkto estas pritraktota nur en la unua sekcio de la Tria Libro de tiu ĉi verko, en kiun ni metas, pro la kunteksto, ankaŭ plurajn aferojn de la nun ĉi tie pritraktata temo. La sinsekvo de la analizo necesigas tiun disŝiron de la temo, kiu samtempe kongruas kun la spirito de la kapitalisma produktado. Nome ĉar tie la laborkondiĉoj ŝajnas sendependaj de la laboristo; ilia ekonomio prezentiĝas do kiel aparta operacio kiu tute ne koncernas lin kaj estas tute

kaj ne sub cirkonstancoj en kiuj mankas la ĉefa persono, la kapitalisto.

malsama ol la metodoj kiuj servas por altigi lian personan produktivon.

La formo de la laboro de multaj, kiuj en la sama produktadprocezo aŭ en diversaj, sed kuntenaj produktadprocezoj laboras laŭplane unu apud kaj kun la alia, nomiĝas kunlaborado.[15]

Kiel la atakforto de kavaleri-eskadro aŭ la rezistforto de infanteriregimento estas esence malsama ol la sumo de la atak- kaj rezist-fortoj individue disvolvata de ĉiu kavaleriano kaj infanteriano, tiel la meĥanika fortsumo de individuaj laboristoj estas malsama ol la socia fortpotenco kiu disvolviĝas, kiam multaj manoj kunefikas samtempe en la sama nedividita operacio, ekz-e kiam necesas levi pezon, turni manivelon aŭ forigi obstaklon el la vojo.[16] La efiko de la kombinita laboro ĉi tie fareblus tute ne de unuopa laboro aŭ nur en multe pli longa tempo aŭ nur nanskale. Temas ĉi tie ne pri altigo de la individua produktivo per kunlaborado, sed pri kreado de produktivo kiu per si mem devas esti amasa forto.[17]

Sendepende de la nova potenco kiu fontas el la kunfandiĝo de multaj fortoj en komunan forton, ĉe la plej multaj produktaj laboroj la nura socia kontakto produktas konkuron kaj apartan inciton de la vivspiritoj (*animal spirits*), kiu altigas la individuan kapablon de la unuopuloj, tiel ke dekduo da personoj kune en samtempa labortago de 144 horoj liveras multe pli grandan ĉiomprodukton ol dek du unuopaj laboristoj, el kiu ĉiu laboras po 12 horojn, aŭ ol laboristo, kiu laboras 12 tagojn sinsekve.[18] Tio venas de

15 „Concours de forces.” (Destutt de Tracy, saml., p. 80)

16 „Ekzistas multnombraj operacioj de tiom simpla speco ke ili ne allasas dividon en partojn, sed kiuj fareblas tamen nur per kunefikado de multaj manparoj. Ekz-e la levado de granda arbotrunko sur ĉaron … mallonge ĉio, kio ne fareblas sen ke granda nombro da manparoj helpas sin reciproke kaj samtempe ĉe la sama nedividita operacio.” (E. G. Wakefield: A View of the Art of Colonization, Londono, 1849, p. 168.

17 „Dum viro ne kapablas levi pezon de tuno, kaj dek viroj devas klopodi por tio, cent viroj povas fari tion per la forto de nur po unu el iliaj fingroj.” (John Bellers: Proposals for raising a colledge of industry, Londono, 1696, p. 21.

18 „*Oni havas ankaŭ* (se la sama nombro da laboristoj estas aplikata de unu farmisto sur 300, anstataŭ de 10 farmistoj sur po 30 akreoj) „en la relativa nombro da laboristoj avantaĝon facile kompreneblan nur por praktikuloj. Oni emus kompreneble diri, ke 1 : 4 rilatas kiel 3 : 12; sed tio ne konfirmiĝas en la praktiko. Ĉar en rikoltotempo kaj ĉe multaj aliaj operacioj kiuj postulas similan rapidon, la laboro estas pli bone kaj pli rapide farita per kunefiko de multaj laborfortoj. Ekz-e dum la rikolto 2 ĉaristoj, 2 ŝarĝistoj, 2 ligistoj, 2 rastistoj, kaj la resto sur la stako aŭ en la garbejo faras duoble da laboro ol la

tio, ke la homo estas de naturo, se ne, kiel Aristotelo opinias, politika[19], ĉiukaze socia animalo.

Kvankam multaj faras samtempe la samon aŭ ion samspecan, la individua laboro de ĉiu povas tamen kiel parto de la ĉiomlaboro prezenti diversajn fazojn de la laborprocezo mem, kiujn la laborobjekto, pro la kunlaborado, pli rapide trairas. Ekz-e se masonistoj faras ĉenon da manoj por transporti konstruŝtonojn de la piedo de skafaldo ĝis ties pinto, ĉiu el ili faras la samon, sed tamen la unuopaj operacioj konsistigas kontinuajn partojn de tuta operacio, apartajn fazojn, kiujn ĉiu konstruŝtono devas trairi en la laborprocezo kaj per kiu la ekz-e 24 manoj de la ĉiomlaboristo transportas ĝin pli rapide ol la du manoj de ĉiu unuopa laboristo kiu alsuprus kaj desuprus la skafaldon.[20] La laborobjekto trairas la saman spacon en pli mallonga tempo. Aliflanke okazas kombinado de la laboro, kiam ekz-e konstruado estas komencata de pluraj flankoj samtempe, kvankam la kunlaborantoj faras la samon aŭ ion samspecan. La kombinita labortago de 144 horoj, kiu atakas la laborobjekton samtempe ĉe multaj flankoj space disaj, elfaras la tutan produkton pli rapide ol 12 dekduhoraj labortagoj de pli aŭ malpli opaj laboristoj kiuj devas ataki sian objekton pli unuflanke. Tio eblas, ĉar la kombinita laboristo aŭ ĉiomlaboristo havas okulojn kaj manojn antaŭe kaj malantaŭe kaj certagrade ĉeestas ĉie. Tiel, samtempe maturiĝas diversaj partoj de la produkto space disaj.

Ni menciis nur la kazon kie la laboristoj reciproke kompletigas sin, faras la saman laboron aŭ similajn. Tio estas la plej simpla formo de kunlaborado, sed ĝi troviĝas, kiel elemento, en la plej evoluinta formo. Se la laborprocezo estas komplika, tiam la nura amaso de la kunlaborantoj ebligas dividi la diversajn operaciojn inter diversaj manoj, plenumigi ilin

---

sama nombro dividita en diversajn grupojn kaj en diversajn farmejojn." ([J. Arbuthnot,]:-An Enquiry into the Connection between the present price of provisions and the size of farms. By a Farmer, Londono, 1773, p. 7, 8)

19 La difino de Aristotelo estas envere tiu, ke la homo estas de naturo civitano, do urbano. Ĝi estas por la klasika antikveco same karakteriza kiel la difino de Franklin: „La homo estas nature instrumentfaristo" por la jankieco.

20 „Krome konstatendas, ke tiu parta labordivido povas okazi ankaŭ tie, kie la laboristoj estas okupataj de sama operacio. Masonistoj ekz-e, kiuj irigas brikojn de mano al mano al pli alta skafaldo, faras ĉiuj la saman laboron, kaj tamen ekzistas inter ili speco de labordivido, kiu konsistas en tio, ke ĉiu el ili pluirigas la brikon certan pecon kaj ĉiuj kune venigas ĝin multe pli rapide al la donita loko ol se ĉiu el ili supren portus sian brikon unuope ĝis la pli alta skafaldo." (F. Skarbek: Théorie des richesses sociales, 2[ème] éd., Parizo, vol. I,

samtempe kaj tiel mallongigi la tempon necesan por fabriki la produkton.[21]

En multaj produktadbranĉoj okazas krizaj momentoj, t.e. tempoj determinitaj de la laborprocezo mem, dum kiuj oni devas atingi certajn laborrezultojn. Ekz-e se ŝafaro estas tondota aŭ se greno estas rikoltota, tiam la kvalito kaj la kvanto de la produkto dependas de la ĝustatempaj komenco kaj fino de la operacio. La tempo, kiun la laborprocezo povas daŭri, estas tie preskribita, ekzemple ĉe kaptado de haringoj. La unuopulo povas eltranĉi el unu tago nur unu labortagon, ekz-e de 12 horoj, sed la kunlaborado de 100 etendas dekduhoran tagon al labortago de 1.200 horoj. La mallongeco de la labortempo estas kompensata de la grandeco de la laborkvanto kiu en la decida momento estas ĵetata en la produktejon. La ĝustatempa efiko dependas ĉi tie de la samtempa aplikado de multaj kombinitaj labortagoj, la amplekso de la utila efiko dependas de la kvanto da laboristoj, kvanto tamen ĉiam malpli granda ol tiu kiu estus necesa por laboristoj kiuj laborus individue en la samaj tempo kaj loko por plenumi la saman taskon.[22] Estas la manko de tia kunlaborado, per kiu en la okcidento de Usono amaso da greno kaj en la partoj de orienta Hindio, kie angla regado detruis la malnovan komunuman reĝimon, ĉiujare amaso da kotono perdiĝas.[23]

Unuflanke la kunlaborado ebligas etendi la agspacon de la laboro, kaj

p. 97, 98)

21 „Ĉu necesas fari komplikan laboron? Pluraj aferoj estas samtempe farendaj. Iu faras ion, dum la alia faras ion alian, kaj ĉiuj kontribuas al la efiko kiun unu sola ne povus produkti. Unu remas, dum la alia tenas la stirilon, kaj trie ĵetas la reton aŭ harpunas la fiŝon, kaj la fiŝkaptado havas sukceson kiu ne eblus sen tiu kunlaboro." (Destutt de Tracy, saml., p. 78)

22 „Ĝia plenumado (de la laboro en kampkulturo) en la decida momento havas des pli grandan efikon." ([J. Arbuthnot,]: An Inquiry into the Connection between the present price etc., p. 7) „En la kampkulturo ne ekzistas faktoro pli grava ol la tempo." (Liebig: Über Theorie und Praxis in der Landwirtschaft [Pri teorio kaj praktiko en la kampkulturo], 1856, p. 23)

23 „Kroma malbonaĵo, kiun oni apenaŭ pensas trovi en lando kiu eksportas pli da laboro ol ia ajn alia de la mondo, escepte eble de Ĉinio kaj Anglio, konsistas en la maleblo akiri sufiĉan nombron da brakoj por la kotonrikolto. Pro tio grandaj kvantoj da kotono restas neplukitaj, dum alia parto, defalinta, estas kolektata de la grundo, kie ĝi kompreneble miskoloriĝis kaj eĉ putris, tiel ke pro manko da laboristoj en la ĝusta sezono la plantisto devas fakte kalkuli kun perdo de granda parto de la la kotonrikolto kiun Anglio tiom atendas." (Bengal Hurkaru. Bi-Monthly Overland Summary of News, 22-a de julio 1861)

pro tio ĝi estas necesa jam per la spaca kunteniĝo de la laborobjekto, ekzemple ĉe sekigo de grundo, konstruado de digoj, akvumado, konstruado de kanaloj, vojoj, fervojoj ktp. Aliflanke ĝi ebligas spacan reduktadon de la produktado, proporcie al ties skalo. Tiu limigo de la laborsfero en la spaco, kun samtempa etendo de ĝia agsfero, per kio ŝpariĝas serio da falsaj kostoj (*faux frais*), fontas el la kunefikado[24] de la laboristoj, el la kunigo de diversaj laborprocezoj kaj el la koncentrado de la produktadrimedoj.[25]

Kompare kun samgranda sumo de unuopaj individuaj labortagoj, la kombinita labortago produktas pli grandajn kvantojn da uzvaloro kaj pro tio malpliigas la labortempon necesan por produktado de certa utila efiko. Egale ĉu la labortago akiras tiun pli altan produktadforton ĉar ĝi altigas la meĥanikan forton de la laboro aŭ etendas ĝian spacan agsferon aŭ reduktas la spacan produktadkampon proporcie al la skalo de produktado aŭ ĉar ĝi disponigas en la kriza momento multan laboron en malmulta tempo aŭ vekas la konkuremon de la individuoj kaj streĉas iliajn energiojn aŭ donas al la samspecaj laboroj de multaj la stampon de konstanteco kaj de multflankeco, aŭ plenumas diversajn operaciojn samtempe aŭ pli ŝpareme konsumas la produktadrimedojn per ilia komuna uzado aŭ donas al la individua laboro la econ de socia mezumlaboro, en ĉiuj ĉi cirkonstancoj la specifa produktadforto de la kombinita labortago estas socia produktadforto de la laboro aŭ produktadforto de socia laboro. Ĝi fontas el la kunlaborado mem. En la laŭplana kunlaborado kun aliaj la laboristo demetas siajn individuajn limojn kaj disvolvas la kapablon de sia specio.[26]

Se laboristoj tute ne povas kunlabori sen esti kunaj, se ilia kuneco sur difinita spaco estas do kondiĉo de ilia kunlaborado, tiam dunglaboristoj ne povas kunlabori sen ke la sama kapitalo, la sama kapitalisto laborigas

---

24 En la originalo: Konglomeration. -vl

25 „Kun la progreso de la terkulturo ĉia kapitalo kaj ĉia laboro, kiuj estis antaŭe aplikataj dise al 500 akreoj kaj eble eĉ pli, estas nun koncentritaj al la pli intensa kultivado de 100 akreoj.” Kvankam „proporcie al la aplikata sumo de kapitalo kaj de laboro la spaco reduktiĝis, ĝi prezentas tamen pli ampleksan produktadsferon kompare kun tiu antaŭe posedata aŭ kultivata de unu sola sendependa produktisto”. (R. Jones: An Essay on the Distribution of Wealth, „On Rent”, Londono, 1831, p. 191)

26 „La forto de la unuopa homo estas tute malgranda, sed la kunigo de tute malgrandaj fortoj donas ĉioman forton kiu estas pli granda ol la sumo de ĉiuj partaj fortoj, tiel ke jam la nura kunigo de la forto povas mallongigi la tempon kaj pligrandigi la spacon de ilia efiko.” (G. R. Carli, Noto pri P. Verri, v.c., vol. XV, p. 196)

ilin samtempe, do aĉetas iliajn laborfortojn samtempe. La ĉiomvaloro de tiuj laborfortoj aŭ la salajrosumo de la laboristoj por la tago, la semajno ktp, devas do troviĝi kune en la poŝo de la kapitalisto antaŭ ol la laborfortoj mem estas kunigataj en la produktadprocezo. Pago de 300 laboristoj samtempe, eĉ nur por unu tago, necesigas pli da kapitalelspezo ol pago de malmultaj laboristoj semajnon post semajno, dum la tuta jaro. La nombro da kunlaborantaj laboristoj, aŭ la skalo de la kunlaborado, dependas do unue de la grando de la kapitalo kiun la unuopa kapitalisto povas elspezi por la aĉeto de laborforto, t.e. de la amplekso en kiu po unu kapitalisto disponas pri la vivrimedoj de multaj laboristoj.

Kaj kiel pri la varia kapitalo statas same pri la konstanta kapitalo. La elspezo por krudmaterialo ekz-e estas 30-oble pli granda por unu kapitalisto kiu dungas 300 laboristojn ol por ĉiu el la 30 kapitalistoj kiuj dungas po 10. Valorgrando kaj materialkvanto de la komune uzataj laborrimedoj kreskas, kvankam ne en la sama mezuro kiel la aplikata nombro da laboristoj, sed ili kreskas konsiderinde. Koncentriĝo de pli grandaj amasoj da produktadrimedoj en la mano de unuopaj kapitalistoj estas do materia kondiĉo por la kunlaborado de dunglaboristoj, kaj la amplekso de la kunlaborado, per aliaj vortoj la skalo de la produktado, dependas de la amplekso de tiu koncentriĝo.

Komence de la kapitalismo certa minimuma grando de la individua kapitalo montriĝis necesa por ke la nombro de la same ekspluatataj laboristoj, pro tio la kvanto de la produktata plusvaloro sufiĉu por liberigi la mastron mem el la manlaboro, fari el etmajstro kapitaliston kaj tiel formale estigi la kapitalreĝimon. Ĝi montriĝas nun kiel materia kondiĉo por la transformado de multaj disaj kaj inter si sendependaj individuaj laborprocezoj en kombinitan socian laborprocezon.

Same, komence la komando de la kapitalo super al laboro montriĝis nur kiel formala sekvo de tio, ke la laboristo laboras anstataŭ por si, por la kapitalisto kaj pro tio sub la kapitalisto. Kun la kunlaborado de multaj dunglaboristoj la komando de la kapitalo evoluas al neceso por plenumado de la laborprocezo mem, al vera produktadkondiĉo. La ordono de la kapitalisto sur la produktadkampo fariĝas nun same nemalhavebla kiel la ordono de la generalo sur la batalkampo.

Ĉia grandskala rekte socia aŭ komuna laboro bezonas pli aŭ malpli gvidadon, kiu peras la harmonion de la individuaj agadoj kaj plenumas la ĝeneralajn funkciojn kiuj estiĝas el la moviĝo de la tuta produktanta korpo malsame al la moviĝo de ĝiaj sendependaj organoj. Unuopa violin-

ludisto direktas sin mem, orkestro bezonas orkestrestron. Tiu funkcio de gvidado, superrigardo kaj perado fariĝas funkcio de la kapitalo, ekde kiam la laboro subordigita al ĝi fariĝas kunlabora. Kiel specifa funkcio de la kapitalo la funkcio de gvidado ricevas specifajn trajtojn.

Unue, la sprona motivo kaj la decida celo de la kapitalisma produktadprocezo estas kiom eble plej granda plivalorigo de la kapitalo[27], tio signifas do kiom eble plej granda ekspluatado de la laborforto fare de la kapitalisto. Kun la kvanto de la samtempe dungitaj laboristoj kreskas ilia rezistado kaj per tio necese la premo de la kapitalo por superi tiun rezistadon. La gvidado de la kapitalisto estas ne nur funkcio fontanta en la naturo de la socia laborprocezo kaj apartenanta al ĝi, ĝi estas samtempe funkcio de ekspluatado de socia laborprocezo kaj pro tio kondiĉita de la neevitebla antagonismo inter la ekspluatisto kaj la krudmaterialo de lia ekspluatado. Same, kun la amplekso de la produktadrimedoj kiuj alfrontas la laboriston kiel fremda proprieto, kreskas la neceso kontroli ties racian uzadon.[28] La kunlaborado de la dunglaboristoj estas krome nura efiko de la kapitalo kiu aplikas ilin samtempe. La kunfunkciado de iliaj laboroj aperas al ili do kiel plano, praktike kiel aŭtoritato de la kapitalisto, kiel potenco de fremda volo, kiu submetas ilian agadon al sia celo.

Se do la kapitalisma gvidado estas laŭ sia enhavo duflanka, pro la duflankeco de la gvidenda produktadprocezo mem, kiu estas unuflanke socia laborprocezo por fabrikado de produkto, aliflanke plivalorigprocezo de la kapitalo, ĝi estas laŭ sia formo despota. Kun la pli grandskala evoluo de la kunlaborado tiu despotismo evoluas siajn apartajn formojn. Kiel la kapitalisto estas unue liberigita el manlaboro, ekde kiam lia kapitalo

27 „Profitoj … estas la sola celo de la afero." (J. Vanderlint, saml., p. 11)

28 Angla filistra gazeto, la Spectator de la 26-a de majo 1866, raportas ke post enkonduko de ia reĝimo de kompanio inter kapitalisto kaj laboristoj en la „Wirework Company of Manchester" <Societo pri Dratprilaboro de Manĉestro>: „la unua rezulto estis subita malpliiĝo de materialmalŝparo, ĉar la laboristoj ne vidis kial ili traktu sian proprieton pli malŝpare ol tiun de la kapitalistoj, kaj materialmalŝparo estas apud nepagitaj ŝuldoj eble la plej granda kaŭzo de perdoj en la fabrikoj". La sama gazeto malkovras kiel esencan difekton de la Rochdale cooperative experiments: „They showed that associations of workmen could manage shops, mills, and almost all forms of industry with success, and they did not leave a clear place for masters." („Ili pruvis, ke laboristaj asocioj kapablas mastrumi butikojn, fabrikojn kaj preskaŭ ĉiajn formojn de industrio kun sukceso, kaj ili eksterordinare plibonigis la situacion de la homoj mem, sed! sed tiam ili lasis nenian videblan lokon por kapitalistoj." Kia hororo!

atingis tiun minimuman grandon per kiu la vera kapitalisma produktado nur komencas, tiel li nun siavice cedas la funkcion de rekta kaj konstanta superrigardo de la unuopaj laboristoj kaj laboristaj grupoj al aparta speco de dunglaboristoj. Kiel armeo bezonas militajn, tiel amaso da laboristoj agantaj sub la komando de la sama kapitalo bezonas industriajn oficirojn (gvidantojn, manaĝerojn) kaj serĝentojn (laborkontrolistojn, foremen, overlookers, contre-maîtres), kiuj dum la laborprocezo komandas nome de la kapitalo. La laboro de kontrolado fariĝas ilia ekskluziva funkcio. Kiam la ekonomikisto komparas la produktadmanieron de sendependaj terkulturistoj aŭ de memstaraj metiistoj kun la plantej-ekonomio bazita sur sklavlaboro, li konsideras tiun laboron de kontrolado kiel flankaj elspezoj de la produktado.[29] Kiam li konsideras la kapitalisman produktadmanieron, li male identigas la funkcion de gvidado, tia kia ĝi fontas el la naturo de la komuna laborprocezo, kun la sama funkcio tia kia ĝi estas kondiĉita de la kapitalisma kaj do antagonisma karaktero de tiu procezo.[30] La kapitalisto estas kapitalisto ne ĉar li estas industria gvidanto, sed li fariĝas industria ordonanto, ĉar li estas kapitalisto. La ĉefkomando en la industrio fariĝas atributo de la kapitalo, kiel en la epoko de la feŭdismo la ĉefkomando en milito kaj tribunalo estis atributo de la grundproprieto.[31]

La laboristo estas proprietulo de sia laborforto tiom longe, kiom li marĉandas pri ĝi kun la kapitalisto, kaj li povas nur vendi kion li posedas, sian individuan, unuopan laborforton. Tiu kondiĉo neniel ŝanĝiĝas per tio ke la kapitalisto aĉetas 100 laborfortojn anstataŭ unu aŭ faras kontrakton kun 100 inter si sendependaj laboristoj anstataŭ kun unu sola. Li povas laborigi la 100 laboristojn sen igi ilin kunlabori. La kapitalisto pagas do la valoron de la 100 sendependaj laborfortoj, sed li ne pagas la kombinitan

29 Post kiam la profesoro Cairnes prezentis la „superintendence of labour” <„kontroladon de la laboro”> kiel ĉefan trajton de la sklava produktado en la sudaj ŝtatoj de Usono, li daŭrigas: „Ĉar la terkultura proprietulo (de la nordo) retenas por si la tutan produkton de sia grundo <ĉe Cairnes: produkton de sia laboro>, li ne bezonas apartan spronon por klopodado. Kontrolado fariĝas tie komplete superflua.” (Cairnes, saml., p. 48, 49)

30 Sir James Steuart, verkisto entute elstara pro sia klarvido por la karakterizaj sociaj diferencoj inter diversaj produktadmanieroj, rimarkigas: „Kial grandaj manufaktur-entreprenoj detruas la familiajn metiejojn se ne per tio ke ili pli proksimiĝas al la simpleco de la sklavlaboro?” („Princ. of Pol. Econ.”, Londono, 1767, vol. I, p. 167, 168)

31 Auguste Comte kaj lia skolo povintus do same pruvi la eternan neceson de feŭdaj sinjoroj kiel ili faris tion por la kapitalsinjoroj.

laborforton de la cent. Kiel sendependaj personoj la laboristoj estas unuopuloj, kiuj eniras rilaton al la sama kapitalo, sed ne unu al la aliaj. Ilia kunlaborado komenciĝas nur en la laborprocezo, sed en la labor-procezo ili jam ĉesis aparteni al si mem. Kun la eniro en ĝin ili estas enkorpigitaj al la kapitalo. Kiel kunlaborantoj, kiel membroj de laboranta organismo, ili estas mem nur aparta ekzistmaniero de la kapitalo. La produktadforto, kiun la laboristo disvolvas kiel socia laboristo, estas do produktadforto de la kapitalo. La socia produktadforto de la laboro disvolviĝas senpage, ekde kiam la laboristoj estas metitaj sub determinitaj kondiĉoj, kaj la kapitalo metas ilin sub tiujn kondiĉojn. Ĉar la socia produktadforto de la laboro kostas neniom al la kapitalo, ĉar aliflanke ĝi ne estas disvolvita de la laboristo antaŭ ol lia laboro mem apartenas al la kapitalisto, ĝi aperas kiel produktadforto kiun la kapitalo posedas de la naturo, kiel ties imanenta produktadforto.

La efiko de la simpla kunlaborado montriĝas kolosa en la gigantaj verkoj de la malnovaj azianoj, egiptoj, etruskoj ktp.

> „Okazis en pasintaj tempoj, ke tiuj aziaj ŝtatoj post kovro de siaj civilaj kaj militaj elspezoj troviĝis en posedo de abundo de vivrimedoj kiujn ili povis uzi por laboraĵoj de pompo kaj de utilo. Ilia komando super la manoj kaj brakoj de preskaŭ la tuta ne kampkulturanta loĝantaro kaj la ekskluziva dispono de la monarĥo kaj de la pastraro pri tiu abundo donis al ili la rimedojn por starigi tiujn gigantajn monumentojn per kiuj ili plenigis la landon … Por la movo de tiuj kolosaj statuoj kaj de la eksterordinaraj masoj, kies transporto mirigas, oni aplikis malŝpare preskaŭ nur homan laboron. La nombro da laboristoj kaj la koncentrado de iliaj klopodoj sufiĉis. Tiel ni vidas grandegajn koralrifojn elŝveli el la profundoj de la oceano ĝis fariĝi insuloj kaj firma lando, kvankam ĉiu individua deponulo (*depositary*) estas eta, malforta kaj malestiminda. La ne kampkulturaj laboristoj de azia monarĥio havas krom siaj individuaj korpaj klopodoj malmulton por kontribui al la granda celo, sed ilia nombro estas ilia forto, kaj la direkta potenco super tiuj amasoj naskis tiujn gigantaĵojn. Estis la koncentriĝo de la enspezoj, per kiuj la laboristoj vivas, en unu aŭ malmultaj manoj, kiu ebligis tiajn entreprenojn."[32]

Tiu potenco de aziaj kaj egiptaj reĝoj aŭ de etruskaj teokratoj ktp transiris en la moderna socio al la kapitalistoj, egale ĉu tiu aperas kiel unuopa kapitalisto aŭ, kiel ĉe akcisocietoj, kiel kombinita kapitalisto.

La kunlaborado en la laborprocezo, tia kian ni trovas antaŭrega en la

32 R. Jones: Text-book of Lectures etc., p. 77, 78. La kolektaĵoj malnovasiriaj, egiptaj ktp en Londono kaj aliaj eŭropaj ĉefurboj faris nin vidatestantoj de tiuj kunlaboraj laborprocezoj.

kulturkomencoj de la homaro, ĉe la ĉasistaj popoloj[33] aŭ ekzemple en la kampkulturado de hindiaj komunumoj, baziĝas unuflanke sur la komuna proprieto je la produktadkondiĉoj, aliflanke sur tio ke la unuopa individuo ankoraŭ tute ne detranĉis al si la umbilikan ŝnuron kiu ligas lin kun lia tribo aŭ lia komunumo, same kiel la abela individuo estas ligita kun la abelaro de sia abelujo.[34] Tiuj du ecoj distingas ĝin de la kapitalisma kunlaborado. La sporada uzo de grandskala kunlaborado en la antikveco, en la mezepoko kaj en la modernaj kolonioj baziĝas sur rilatoj de rekta dominado kaj de servuto, ĝenerale sur sklavismo. La kapitalisma kunlaborado antaŭkondiĉas, male, ekde la unua momento la liberan dunglaboriston, kiu vendas sian laborforton al la kapitalo. Sed historie ĝi evoluis kontraste al la kampkultura ekonomio kaj al la sendependa metiejo, egale ĉu tiu havas korporacian formon aŭ ne.[35] Fronte al tiuj formoj, la kapitalisma produktado prezentiĝas ne kiel aparta historia formo de kunlaborado, sed la kunlaborado mem kiel formo propra al la kapitalisma produktadprocezo kaj kiel historia formo kiu specife distingas ĝin.

Kiel la kolektiva[36] produktadforto de la laboro disvolvita de la kunlaborado aperas kiel produktadforto de la kapitalo, tiel la kunlaborado mem aperas kiel specifa formo de la kapitalisma produktadprocezo kontraste al la produktadprocezo de unuopaj sendependaj laboristoj aŭ eĉ de etmajstroj. Tiu estas la unua fazo kiun la reala laborprocezo trairas per sia subiĝo al la kapitalo. Tiu ŝanĝo okazas sponte. Ĝia antaŭkondiĉo, la samtempa laborigo de relative granda nombro da dunglaboristoj en la sama laborprocezo, konsistigas la deirpunkton de la kapitalisma produktado. Tiu koincidas kun la ekzisto de la kapitalo mem. Do, se la kapitalisma produktadmaniero prezentiĝas unuflanke kiel historia neceso por la transformo de la laborprocezo en socian procezon, aliflanke tiu socia formo de la laborprocezo prezentiĝas kiel metodo aplikata de la kapitalo por pli profitige ekspluati ĝin per pliigo de ĝia produktadforto.

33 Linguet en sia „Théorie des Lois civiles” eble ne malpravas, kiam li deklaras la ĉasadon la unua formo de kunlaborado kaj la homĉasadon (militon) unu el la unuaj formoj de ĉasado.

34 Vortumo de la lasta frazo parte laŭ la franca eld. -vl

35 La malgranda kampkultura ekonomio kaj la sendependa metiejo, kiuj estas ambaŭ la bazo de la feŭda produktadmaniero kaj post ties dissolviĝo aperis parte apud la kapitalisma entrepreno, estas samtempe la ekonomia bazo de la klasikaj komunumoj en ties plej bona tempo, post kiam la origine orienta komuna proprieto dissolviĝis kaj antaŭ ol la sklavismo serioze transprenis la produktadon.

36 Tiel en la franca eld.; en la germana: „socia”. -vl

En sia ĝis nun konsiderata formo la kunlaborado koincidas kun la pli grandskala produktado, sed ne konsistigas fiksan karakterizan formon de aparta evoluepoko de la kapitalisma produktadmaniero. Ĝi povas eble ŝajni proksimume tia en la ankoraŭ metiaj komencoj de la manufakturo[37] kaj en ĉia granda kampkulturado kiu respondas al la manufakturperiodo kaj kiu distingiĝas de la kampkultura ekonomio esence nur per la amaso da samtempe aplikataj laboristoj kaj la amplekso de la koncentritaj produktadrimedoj. La simpla kunlaborado estas ĉiam ankoraŭ antaŭreganta formo de tiaj produktadbranĉoj en kiuj la kapitalo agas grandskale, sen ke labordivido aŭ maŝinaro ludas gravan rolon.

La kunlaborado restas la baza formo de la kapitalisma produktadmaniero, kvankam ĝia simpla formo mem aperas kiel aparta formo apud siaj pli evoluintaj formoj.

37 „Ĉu la kunigo de lerteco, diligento kaj konkurado de multaj kune ĉe la sama projekto ne estas la vojo antaŭenigi ĝin? Kaj ĉu alie Anglio kapablintus tiom perfektigi sian lanmanufakturon?” (Berkeley, „*The Querist*”, Londono, 1750, p. 56, § 521)

# *DEKDUA ĈAPITRO Labordivido kaj manufakturo*

## 1. Duobla origino de la manufakturo

La kunlaborado bazita sur labordivido kreas al si sian klasikan formon en la manufakturo. Ĝi antaŭregas kiel karakteriza formo de la kapitalisma produktadprocezo dum la vera manufakturperiodo, kiu daŭris proksimume de la mezo de la 16-a jarcento ĝis la lasta triono de la dekoka.

La manufakturo havas duoblan originon.

Unu origino estas jena: Laboristoj, kiuj estis diversspecaj, memstaraj metiistoj, tra kies manoj produkto devas laŭvice trairi ĝis sia lasta maturiĝo, estas kunigitaj en metiejo sub la komando de la sama kapitalisto. Ekzemple kaleŝo estis la ĉiomprodukto de la laboroj de granda nombro da sendependaj metiistoj, kiel ĉarfaristoj, selistoj, tajloroj, seruristoj, zonistoj, tornistoj, pasamentistoj, vitristoj, farbistoj, lakistoj, orumistoj ktp. La manufakturo de kaleŝoj kunigas ĉiujn ĉi diversajn metiistojn en unu laborejon, kie ili laboras samtempe kaj man-en-mane. Estas vere ke oni ne povas orumi kaleŝon antaŭ ol tiu estas farita. Sed se multaj kaleŝoj estas farataj samtempe, tiam parto fariĝas konstante orumebla, dum alia parto trairas antaŭan fazon de la produktadprocezo. Ĝis tie ni staras ankoraŭ sur la tereno de la simpla kunlaborado kiu trovas sian materialon je homoj kaj aĵoj preta. Tamen tre baldaŭ okazas esenca ŝanĝo. La tajloro, seruristo, zonisto ktp, kiu okupiĝas nur pri kaleŝfarado, perdas iom post iom kun la kutimo ankaŭ la kapablon plenumi sian malnovan metion en ties tuta amplekso. Aliflanke lia unuflankigita agado ricevas nun la plej laŭcelan formon por la reduktita agadsfero. Origine la kaleŝfarado montriĝis kiel kombinaĵo de memstaraj metiistoj. Ĝi fariĝas iom post iom divido de la kaleŝproduktado en ties diversajn apartajn operaciojn, el kiuj ĉiu unuopa kristaliĝas al ekskluziva funkcio de unu laboristo kaj kies ĉioma laboro estas farata de la kunlaborado de tiuj partlaboristoj. Same estiĝis la tolmanufakturo kaj tuta serio da aliaj manufakturoj el la kombinado de diversaj metioj sub la komando de la sama kapitalo.[38]

38 Por montri pli modernan ekzemplon de tiu estiĝmaniero de la manufakturo, jena citaĵo. „La silk-ŝpinado kaj -teksado de Liono kaj Nimo „estas tute patriarĥeca; ĝi laborigas multajn virinojn kaj infanojn, sed sen tro lacigi aŭ senmoraligi ilin; ĝi lasas ilin en iliaj belaj valoj de Dromo, de Varo, de Izero kaj de Vaŭkluzo por tie bredi silkraŭpojn kaj malvolvi iliajn kokonojn; ĝi fariĝas neniam vera fabriko. Por esti spite al tio bone aplikata, la principo de labordivido alprenas ĉi tie apartan econ. Ekzistas ja haspelistinoj, silktordistoj, tinkturistoj, varpŝliĥtistoj, krome teksistoj; sed ili ne estas kunigitaj en saman

Sed la manufakturo estiĝas ankaŭ sur la kontraŭa vojo. Multaj metiistoj, kiuj faras la samon aŭ ion samspecan, ekz-e faras paperon aŭ litertipojn aŭ pinglojn, estas laborigataj de la sama kapitalo samtempe en la sama laborejo. Tiu estas kunlaborado en la plej simpla formo. Ĉiu el tiuj metiistoj (eble kun unu aŭ du submajstroj) faras la tutan varon kaj plenumas do la diversajn operaciojn necesajn por ĝia produktado laŭvice. Li laboras plu en sia malnova metia maniero. Tamen baldaŭ eksteraj cirkonstancoj instigas uzi alie la saman ejon kaj la samtempecon de iliaj laboroj. Ekz-e se pli granda kvanto da preta varo estas liverota en determinita tempo. La laboro estas do dividita. Anstataŭ farigi la diversajn operaciojn al la sama metiisto laŭ tempa vico, ili estas disigitaj, izolitaj, space apudigitaj, ĉiu el ili atribuita al alia metiisto kaj ĉiuj samtempe plenumataj de la kunlaborantoj. Tiu hazarda divido ripetiĝas, montras siajn apartajn avantaĝojn kaj iom post iom rigidiĝas en sisteman labordividon. El la individua produkto de memstara metiisto, kiu faras multon diversan, la varo transformiĝas en la socian produkton de asocio de metiistoj, el kiuj ĉiu faras konstante nur unu saman partan operacion. La samaj operacioj, kiuj fluis unu en la alian kiel sinsekvaj faroj de la germana korporacia paperfaristo, memstariĝas en la holanda papermanufakturo en detalajn operaciojn faratajn paralele de la diversaj membroj de kunlaboranta grupo. La korporacia pinglofaristo de Nurenbergo estas la fundamenta elemento de la angla pinglomanufakturo; sed dum tiu unu pinglofaristo tralaboris eble 20 operaciojn unu post la alia, ĉi tie ĉiu faras nur unu el la 20 operacioj, kiuj pro postaj spertoj estis ankoraŭ pli subdividitaj, izolitaj kaj kiel ekskluzivaj funkcioj atribuitaj al unuopaj laboristoj.

La estiĝmaniero de la manufakturo, ĝia elformiĝo el la metio estas do duvizaĝa. Unuflanke ĝi deiras el la kombinado de diversspecaj, memstaraj metioj, kiujn oni diserigas kaj simpligas ĝis la punkto kie ili estas jam nur partaj kaj reciproke komplementaj operacioj en la produktado de unu sama varo. Aliflanke ĝi deiras el la kunlaborado de samspecaj metiistoj, diserigas la saman individuan metion en ĝiajn diversajn apartajn operaciojn kaj izolas kaj memstarigas ilin ĝis la punkto en kiu ĉiu el ili fariĝas

---

laborejon, ne dependaj de la sama majstro; ili ĉiuj estas sendependaj.” (A. Blanqui: Cours d'Écon. Industrielle, Recueilli par A. Blaise, Parizo, 1838-1839, p. 79) Post kiam Blanqui skribis tion, la diversaj sendependaj laboristoj estis parte kunigitaj en fabrikoj. *Noto al la 4-a eldono:* Kaj kiam Markso skribis la supran tekston, la vaporteksejo hejmiĝis en tiuj fabrikoj kaj rapide forŝovas la manteksilon. La silkindustrio de Krefeldo scias ankaŭ ion pri tio. – Frederiko Engelso}

ekskluziva funkcio de aparta laboristo. Do, unuflanke la manufakturo enkondukas labordividon en produktadprocezon aŭ plu disvolvas ĝin, aliflanke ĝi kombinas antaŭe disajn metiojn. Sed kia ajn estas ĝia aparta deirpunkto, ĝia fina formo estas la sama – produktadmeĥanismo, kies organoj estas homoj.

Por ĝuste kompreni la labordividon en al manufakturo, esence gravas ne perdi el la vido la du sekvajn punktojn: Unue la analizo de la produktadprocezo en ĝiaj apartaj fazoj koincidas ĉi tie tute kun la diserigo de metia agado en ties diversajn partajn operaciojn. Ĉu kompleksa aŭ simpla, la plenumado de tiuj operacioj restas metieca kaj pro tio dependa de forto, lerteco, rapideco, certeco de la unuopa laboristo en la uzado de sia instrumento. La metio restas la bazo. Tiu mallarĝa teĥnika bazo ekskludas vere sciencan analizon de la produktadprocezo, ĉar ĉiu parta procezo, kiun la produkto trairas, devas esti plenumebla kiel metieca partlaboro. Ĝuste ĉar la metia lerteco tiel restas la bazo de la produktadprocezo, ĉiu laboristo estas atribuita al ekskluzive unu parta funkcio kaj lia laborforto transformita en la vivolongan organon de tiu parta funkcio. Fine tiu labordivido estas aparta maniero de kunlaborado, kaj pluraj ĝiaj avantaĝoj fontas en la ĝenerala karaktero de kunlaborado, ne en ties aparta formo.

# 2. La partlaboristo kaj lia ilo

Se ni nun eniras kelkajn detalojn, ni vidas unue ke la partlaboristo transformas sian korpon tute en ekskluzivan kaj aŭtomatan organon de la sola kaj sama simpla operacio, kiun li faras dum sia tuta vivo, tiel ke li bezonas por ĝi malpli da tempo ol la metiisto kiu plenumas tutan serion da operacioj. Sed la kombinita ĉiomlaboristo, kiu konsistigas la vivan meĥanismon de la manufakturo, konsistas el multaj tiaj unuflankaj partlaboristoj. Kompare kun la memstara metio produktiĝas pli en malpli da tempo, alivorte la produktadforto de la laboristoj estas pli alta.[39] La metodo de partlaboro perfektiĝas ankaŭ, post kiam ĝi izoliĝis al ekskluziva funkcio de unu persono. La konstanta ripetiĝo de la sama limigita ago kaj la koncentriĝo de la atento sur tiun limitaĵon instruas laŭ la sperto

39 „Ju pli laboro de granda diverseco estas dividita kaj atribuita al diversaj partlaboristoj, des pli bone kaj pli rapide ĝi estas farita, kun malpli da perdo je tempo kaj laboro." (The Advantages of the East India Trade, Londono, 1720, p. 71)

atingi la celatan efikon per la plej malgranda elspezo de forto. Sed ĉar ĉiam diversaj generacioj de laboristoj kunlaboras, la tiel akiritaj teĥnikaj trukoj baldaŭ firmiĝas, multiĝas kaj transdoniĝas.[40]

La manufakturo produktas efektive la virtuozecon de la detallaboristo, per tio ke ĝi ene de la laborejo reproduktas kaj sisteme kondukas ĝis ekstremo la naturan disecon de la metioj kiun ĝi trovis en la mezepokaj urboj. Aliflanke ĝia transformado de la partlaboro en vivprofesion de homo respondas al la tendenco de antaŭaj socioj fari la metiojn heredaj, ŝtonigi ilin en kastojn aŭ rigidigi ilin en korporaciojn, se certaj historiaj kondiĉoj produktas variemon de la individuo, kiu kontraŭdiras kastan reĝimon. Kastoj kaj korporacioj fontas el la sama naturleĝo, kiu reguligas la dividon de plantoj kaj animaloj en speciojn kaj subspeciojn, kun la diferenco ke sur certa evolugrado la heredeco de la kastoj aŭ la ekskluziveco de la korporacioj estas dekretita kiel socia leĝo.[41]

> „La islamanoj de Dakko estis neniam superataj je fajneco, je la kotono kaj aliaj produktoj de Koromandel, je brileco kaj daŭremo de iliaj koloroj. Kaj tamen ili estas produktataj sen kapitalo, sen maŝinoj, sen labordivido, sen ajna el la rimedoj kiuj konsistigas tiom da avantaĝoj favore al la eŭropa fabrikado. La teksisto estas izolita individuo kiu faras la teksaĵon laŭ mendo de kliento kaj per teksilo de plej simpla konstruo, kelkfoje konsistanta nur el lignaj, krude kunmetitaj stangoj. Li posedas eĉ ne aparaton por munti la vafton, la teksilo devas do resti etendita en sia tuta longeco kaj tiel fariĝas tiom misforma kaj larĝa ke ĝi ne trovas spacon en la kabano de la produktisto, kiu devas do fari sian laboron en libera aero, kie ĉia veterŝanĝo interrompas ĝin."[42]

---

40 „Facile farata laboro estas tradiciita lerteco." (Th. Hodgskin: Popular Political Economy, p. 48)

41 „Ankaŭ la artoj evoluis … en Egiptio al alta grado de perfekteco. Ĉar tiu estas la sola lando kie la metiistoj neniam intervenas en la aferojn de alia klaso de civitanoj, ĉar ili estas leĝe devigataj plenumi sian solan heredan alvokitecon. Ĉe aliaj popoloj okazas ke la metiistoj disigas sian atenton sur tro granda nombro da objektoj. Jen ili provas kampkulturadon, jen komercon, aŭ ili dediĉas sin al pluraj artoj samtempe. En la liberaj ŝtatoj ili iras plej ofte al la popolaj asembleoj. En Egiptio, male, la metiisto ricevas severajn punojn, se li enmiksiĝas en ŝtatajn aferojn aŭ en la praktikon de pluraj metioj. Nenio povas do ĝeni ilian metian diligenton … Krome, kiel ili havas de siaj antaŭuloj multajn regulojn, ili vigle strebas malkovri novajn avantaĝojn." (Diodoro de Sicilio: Historische Bibliothek, I. I., ĉ. 74)

42 „Historical and descriptive Account of Brit. India ktp", By Hugh Murray, James Wilson ktp, Edinburgo, 1832, vol. II, p. 449, 450. La hindia teksilo estas tia ke la varpo estas muntata vertikale.

Estas nur la aparta lerteco, heredata de generacio al generacio kaj de patro al filo, kiu donas al la hindo kiel al la araneo tian virtuozecon. Kaj tamen tia hinda teksisto plenumas tre komplikan laboron, kompare kun la plej multaj manufakturlaboristoj.

Metiisto, kiu plenumas unu post la alia la diversajn partprocezojn en la produktado de objekto, devas ŝanĝi jen la lokon, jen la instrumentojn. La transiro de unu operacio al alia interrompas la fluon de lia laboro kaj formas kvazaŭ porojn en lia labortago. Tiuj poroj densiĝas, ekde kiam li la tutan tagon faras konstante unu saman operacion, aŭ ili malaperas laŭ la mezuro en kiu la ŝanĝoj de lia operacio malpliiĝas. La pli granda produktiveco ŝuldiĝas ĉi tie aŭ al la pli granda elspezo de laborforto en donita tempo, do al kreskanta laborintenso, aŭ al malpliiĝo de neproduktiva konsumo de laborforto. Ĉar la abundo da fortelspezo, kiun ĉia transiro el ripozo al moviĝo bezonas, kompensiĝas ĉe pli longa daŭro de la atingita normala rapideco. Aliflanke la konstanteco de samforma laboro detruas la impeton kaj la streĉitecon de la vivenergioj, kiuj trovas refreŝiĝon kaj ĉarmon en la ŝanĝo de la agado mem.

La produktivo de la laboro dependas ne nur de la virtuozeco de la laboristo, sed ankaŭ de la perfekteco de liaj instrumentoj. Samspecaj instrumentoj, ekz-e tranĉaj, boraj, truigaj, frapaj ktp, estas uzataj en diversaj laborprocezoj, kaj same unu sola ilo povas servi en la sama procezo por diversaj operacioj. Sed ekde kiam la diversaj operacioj de laborprocezo estas disigitaj kaj ĉiu partoperacio akiras en la mano de la partlaboristo kiom eble plej konvenan kaj do ekskludan formon, necesas ŝanĝoj de la iloj kiuj antaŭe servis al diversaj celoj. La direkto de ilia formŝanĝo rezultas el la sperto de la apartaj malfaciloj kiun la senŝanĝa formo kaŭzas. La diferencigo de la laboriloj, per kiu samspecaj instrumentoj ricevas apartan fiksan formon por ĉiu aparta uzado, kaj ilia specialigo, per kiu ĉiu tia aparta ilo efikas en sia tuta amplekso nur en la mano de specifa partlaboristo, karakterizas la manufakturon. Sole en Birminghamo oni produktas proksimume 500 variaĵojn de marteloj, el kiuj ĉiu servas ne nur por unu aparta produktadprocezo, sed multaj variaĵoj ofte nur por diversaj operacioj en la sama procezo. La manufakturperiodo simpligas, plibonigas kaj multspecigas la laborilojn per ties adapto al la ekskluziva aparta funkcio de la partlaboristo.[43] Ĝi kreas per tio samtempe

43 Darvino rimarkigas en sia epokfara verko „Pri la estiĝo de la specioj” rilate al la naturaj organoj de plantoj kaj animaloj: „Tiom longe, kiom unu sama organo devas plenumi diversajn laborojn, kaŭzo de ĝia ŝanĝemo troveblas eble en tio ke natura bredado konservas aŭ subpremas ĉiun etan devojiĝon de

unu el la materiaj kondiĉoj de maŝinaro, kiu konsistas el kombinaĵo de simplaj instrumentoj.

La detallaboristo kaj lia ilo konsistigas la simplajn elementojn de la manufakturo. Ni transiru nun al ĝia ĝenerala meĥanismo.

# 3. La du bazaj formoj de la manufakturo – heterogena manufakturo kaj organika manufakturo

La organizo de la manufakturo posedas du bazajn formojn, kiuj malgraŭ okazaj kombiniĝoj konsistigas du esence malsamajn specojn kaj ludas tute malsaman rolon ankaŭ ĉe la posta transformiĝo de la manufakturo en la maŝin- reĝimon de la granda industrio. Tiu duobleco fontas en la naturo de la farita laboraĵo mem. Tiu estas farata per nur meĥanika kunmetado de memstaraj partproduktoj aŭ ĝi dankas sian pretan formon al serio da kunteniĝaj procezoj kaj manipuladoj.

Lokomotivo ekz-e konsistas el pli ol 5.000 memstaraj partoj. Sed ĝi ne povas servi kiel ekzemplo de la unua speco de la vera manufakturo, ĉar ĝi estas faritaĵo de la granda industrio. Sed jes ja la horloĝo, per kiu ankaŭ William Petty ilustras la manufakturecan labordividon. El la individua produkto de nurenberga metiisto la horloĝo transformiĝis en la socian produkton de granda nombro da partlaboristoj, ekz-e kadrofaristo, risortofaristo, ciferplatfaristo, spiralrisortfaristo, juveltru- kaj rubenlevil-faristo, montrilfaristo, kestfaristo, ŝraŭbfaristo, orumisto, kun multaj subfakoj, ekz-e radfaristo (latunaj kaj ŝtalaj radoj disaj), faristo de dentradaro, de montrilmovilo, acheveur de pignon (fiksas la radojn sur la aksojn, poluras la facetojn ktp), pivotfaristo, planteur de finissage (lokas diversajn radojn kaj aksojn), finisseur de barillet (tranĉas dentojn en la radojn, faras precizmezurajn truojn, firmigas la haltigilon), faristo de malakcelilo, ĉe la cilindra malakcelilo siavice cilindrofaristo, malakcelilrad-faristo, balancierrad-faristo, *raquette*-faristo (la aparato por reguligi la horloĝon), planteur d'échappement (kiu enmetas la malakcelilon); poste la repasseur de barrillet (finpretigas la keston de la risorto), acierpoluristo, radpoluristo, ŝraŭbpoluristo, ciferpentristo, ciferplat-emajlisto (fandas la emajlon sur la

la formo malpli zorge ol kiam la sama organo estus destinita al nur unu aparta celo. Ekzemple tranĉiloj, kiuj estas destinitaj por tranĉi diversajn aĵojn, povas havi ĝenerale sufiĉe ajnecan formon, dum ilo destinita por unueca uzado devas havi por ĉia alia uzado ankaŭ alian formon.”

kupron), fabricant de pendants (faras nur la ringon per kiu la kesto pendiĝas), finisseur de charnière (ŝovas la latunan stifton en la mezon de la kesto ktp), faiseur de secret (faras la risortojn en la kesto, kiuj salte malfermas la kovrilon), gravuristo, cizelisto, kestpoluristo ktp ktp, kaj fine la *repasseur*, kiu kunmetas la tutan horloĝon kaj liveras ĝin funkcianta. Nur malmultaj partoj de la horloĝo iras tra diversaj manoj, kaj ĉiuj ĉi disaĵoj kolektiĝas nur en la mano kiu fine kunigas ilin al meĥanika tutaĵo. Tiu ekstera rilato de la preta produkto al siaj diversspecaj elementoj lasas ĉi tie, kiel ĉe similaj faritaĵoj, la kombinadon de la partlaboristoj en la sama laborejo al la hazardo. La partlaboroj siavice fareblas kiel inter si sendependaj metioj, kiel en la kantonoj Vaŭdo kaj Neuchâtel, dum ekz-e en Ĝenevo ekzistas grandaj horloĝmanufakturoj, kie do okazas rekta kunlaborado de la partlaboristoj sub la komando de unu sama kapitalo. Eĉ en la lasta kazo ciferplato, risorto kaj kesto estas malofte fabrikataj en la manufakturo mem. La kombinita manufaktureca entrepreno estas tie profitiga nur en esceptaj kondiĉoj, ĉar la konkurenco estas plej granda inter la laboristoj, kiuj volas labori hejme, ĉar la diseco de la produktado en amaso da heterogenaj procezoj ebligas nur malmultan uzadon de komunaj laborrimedoj kaj ĉar la kapitalisto ĉe la disa fabrikado ŝparas la elspezon por laborkonstruaĵoj ktp.[44] Tamen ankaŭ la pozicio de tiuj detallaboristoj, kiuj laboras hejme, sed por kapitalisto (fabrikisto[45], établisseur), estas absolute malsama ol tiu de la memstara metiisto, kiu laboras por siaj propraj klientoj.[46]

44 Ĝenevo produktis en la jaro 1854 80.000 horloĝojn, eĉ ne kvinonon de la horloĝproduktado de la kantono Neuchâtel. Ĉaŭdefono [orig.: *La-Chaux-de-Fonds*], kiu konsidereblas kiel unu sola horloĝmanufakturo, sole liveras jare la duoblon de Ĝenevo. De 1850 ĝis 1861 Ĝenevo liveris 720.000 horloĝojn. Vidu „Report from Geneva on the Watch Trade” en „Reports by H. M.'s Secretaries of Embassy and Legation on the Manufactures, Commerce etc.”, n-ro 6, 1863. Dum jam sole la foresto de rilatoj inter la apartaj operacioj, en kiuj konsistas la produktado de aĵoj simple kunmetitaj, tre malfaciligas la transformadon de tiaj manufakturoj en la maŝinprincipon de la granda industrio; en la kazo de la horloĝo aldoniĝas ankoraŭ du aliaj malhelpoj: la eteco kaj delikateco de ĝiaj elementoj kaj ĝia lukseco, kio kaŭzas ĝian variecon, tiel ke ekz-e en la plej bonaj londonaj firmaoj oni faras dum la tuta jaro apenaŭ dek horloĝojn kiuj similas unu la alian. Eĉ la horloĝfabriko de Vacheron & Constantin, kiu sukcese aplikas maŝinaron, liveras maksimume 3 ĝis 4 diversajn variaĵojn de grando kaj formo.

45 En la Esperanta traduko mi uzas la vorton *fabrikisto* sinonime kun *fabrikestro* kaj *fabrikmastro*. -vl

46 En la horloĝfarado, tiu klasika ekzemplo de la heterogena manufakturo, eblas

La dua speco de la manufakturo, ĝia perfekta formo, produktas aĵojn kiuj trairas kunteniĝajn evolufazojn, serion da ŝtupaj procezoj, kiel ekz-e la drato en la kudropingla manufakturo trairas la manojn de 72 kaj eĉ de 92 specifaj partlaboristoj.

Se tia manufakturo kombinas antaŭe disajn metiojn, ĝi malpliigas la spacan disecon inter la apartaj produktfazoj de la artiklo. La tempo de ĝia transiro el unu stadio al la alia estas mallongigita, same la laboro kiu peras tiujn transirojn.[47] Kompare kun la metio, oni gajnas do produktadforton, kaj tiu gajno fontas en la ĝenerala kunlaboreco de la manufakturo. Aliflanke ĝia aparta principo de labordivido kaŭzas izolitecon de la diversaj produktadfazoj, kiuj estas inter si memstarigitaj kiel same multaj metiaj partlaboroj. La produktado kaj konservado de la kunteksto inter la izolitaj funkcioj necesigas konstantan transporton de la faritaĵo de unu mano en la alian kaj el unu procezo en la alian. El la vidpunkto de la granda industrio tio aperas kiel karakteriza, multekosta limiĝo imanenta al la principo de manufakturo.[48]

Se oni rigardas certan kvanton da krudmaterialo, ekz-e de ĉifonoj en la papermanufakturo aŭ de drato en la pinglomanufakturo, ĝi trairas en la manoj de la diversaj partlaboristoj tempan sinsekvon da ŝtupoj en la produktadfazoj ĝis sia fina formo. Sed se oni male rigardas la metiejon kiel tutaĵan meĥanismon, tiam la krudmaterialo troviĝas samtempe en ĉiuj siaj produktadfazoj. Per parto el siaj multaj instrumente armitaj manoj la ĉiomlaboristo, kombinita el la detallaboristoj, tiras la draton, dum li samtempe per aliaj manoj kaj iloj streĉas ĝin, per aliaj tranĉas ĝin, pintigas ktp. El tempa sinsekvo la diversaj ŝtupaj procezoj estas transformitaj al spaca apudeco. Pro tio okazas pli da liverado de preta varo en la sama tempo.[49] Tiu samtempeco ja fontas el la ĝenerala kunlabora formo de la

studi tre precize la supre menciitan, en la disigo de la metia agado fontantan diferencigon kaj specialigon de la laborinstrumentoj.

47 „Se la homoj laboras tiom dense unu apud la alia, tiam la transporto devas esti nepre malpli granda.” (The Advantages of the East India Trade, p. 106.)

48 „La izoliteco de la diversaj fazoj de manufakturo, kiu sekvas el la aplikado de manlaboro, ege altigas la produktadkostojn, ĉe kio la perdo estiĝas ĉefe pro la nura transporto de unu laborprocezo al la alia.” (The Industry of Nations, Londono, 1855, parto II, p. 200)

49 „Ĝi” (la labordivido) „kaŭzas ankaŭ tempoŝparon, per tio ke ĝi disigas la laboron en ĝiajn diversajn branĉojn, kiuj plenumeblas ĉiuj en la sama momento … Per la samtempa plenumado de ĉiuj diversaj laborprocezoj, kiujn unuopulo devintus fari dise, fariĝas ebla produkti multajn pinglojn en la sama tempo en

ĉiomprocezo, sed la manufakturo ne nur trovas la ekzistantajn kondiĉojn de la kunlaborado, sed parte nur kreas ilin per la disigo de la metia agado. Aliflanke ĝi atingas tiun socian organizadon de la laborprocezo nur per fiksado de la sama laboristo al la sama detalo.

Ĉar la partoprodukto de ĉiu partlaboristo estas samtempe nur aparta evoluŝtupo de la sama artiklo, laboristo liveras al la alia aŭ laborgrupo al alia ties krudmaterialon. La laborrezulto de iu fariĝas la deirpunkto por la laboro de la alia. Unu laboristo laborigas ĉi tie do rekte la alian. La labortempo necesa por atingi la celatan uzefikon en ĉiu parta procezo scieblas per la sperto, kaj la tuta meĥanismo de la manufakturo baziĝas sur la antaŭkondiĉo ke oni atingas en donita labortempo donitan rezulton. Nur sub tiu kondiĉo la diversaj laborprocezoj, kiuj kompletigas unu la alian, povas okazi seninterrompe, samtempe kaj space unu apud la alia. Estas klare ke tiu rekta dependeco de la laboroj kaj pro tio de la laboristoj inter si devigas ĉiun uzi nur la necesan tempon por sia funkcio, kaj ke tiel estiĝas tute alia kontinueco, samformeco, reguleco, ordo[50] kaj ĉefe ankaŭ intenseco de la laboro ol en la sendependa metio aŭ eĉ en la simpla kunlaborado. Ke por varo oni aplikas nur la tempon socie necesan por ĝia fabrikado, tio aperas ĉe la varproduktado entute kiel ekstera trudo de la konkurenco, ĉar, supraĵe dirite, ĉiu unuopa produktanto devas vendi la varon je ties merkata prezo. En la manufakturo, male, la liverado de donita kvanto da produkto en donita labortempo fariĝas teĥnika leĝo de la laborprocezo mem.[51]

Sed diversaj operacioj bezonas malsamajn daŭrojn kaj pro tio liveras en samaj daŭroj malsamajn kvantojn da partproduktoj. Do, se la sama labor-isto devas ĉiutage fari nur la saman operacion, tiam oni devas dungi por diversaj operacioj diversajn proporciajn nombrojn da laboristoj, ekz-e 4 gisistoj kaj 2 derompistoj por unu frotisto en unu sama tiparmanufakturo, kie la gisisto ĉiuhore gisas 2.000 litertipojn, la derompisto derompas 4.000 kaj la frotisto frotpoluras 8.000. Ĉi tie la principo de kunlaborado revenas en sia plej simpla formo, samtempa laboro de multaj kiuj faras

kiu alie unuopa pinglo estus nur tranĉita aŭ pintigita.” (Dugald Stewart, l.c., p. 319)

50 „Ju pli diversspeca la specialaj laboristoj en ĉiu manufakturo, … des pli orda kaj laŭregula estas ĉia laboro; tiu farendas nepre en malpli da tempo, kaj la laboro devas malpliiĝi.” (The Advantages etc., p. 68)

51 Tamen la manufaktura sistemo atingas tiun rezulton en multaj branĉoj nur malperfekte, ĉar ĝi ne scias regi kun certeco la ĝeneralajn ĥemiajn kaj fizikajn kondiĉojn de la produktadprocezo.

ion similan, sed nun kiel esprimo de organika rilato. La manufaktura labordivido simpligas kaj diversigas do ne nur la kvalite diversajn organojn de la socia ĉiomlaboristo, sed ĝi kreas ankaŭ matematike fiksan proporcion por la kvanta amplekso de tiuj organoj, t.e. por la relativa laborkvanto aŭ relativa grando de la laborgrupoj en ĉiu aparta funkcio. Ĝi disvolvas kun la kvalita strukturo la kvantan regulon kaj proporciecon de la socia laborprocezo.

Ekde kiam la plej taŭga proporcia nombro de la diversaj grupoj de partlaboristoj estas fiksita per la sperto por donita skalo, tiu skalo etendeblas nur per obligo de ĉiu aparta laboristgrupo.[52] Aldoniĝas ke la sama individuo plenumas certajn laborojn same bone sur pli granda kiel sur pli granda nivelo, ekz-e la laboron de la supera superrigardo, la transporton de la partaj produktoj el unu produktadfazo al la alia ktp. La memstarigo de tiuj funkcioj aŭ ilia atribuado al apartaj laboristoj fariĝas do avantaĝa nur kun pligrandigo de la dungita nombro da laboristoj, sed tiu pligrandigo devas tuj koncerni ĉiujn grupojn proporcie.

La unuopa grupo, nombro da laboristoj, kiuj faras la saman partfunkcion, konsistas el homogenaj elementoj kaj konsistigas apartan organon de la tuta meĥanismo. Sed en diversaj manufakturoj la grupo mem estas strukturita laborkolektivo, dum la ĉioma meĥanismo konsistas el ripetado aŭ obligado de tiuj produktantaj elementaj organismoj. Ni rigardu ekz-e la manufakturon de vitraj boteloj. Ĝi konsistas el tri esence diversaj fazoj. Unue la prepara fazo, ekz-e preparado de la vitra komponaĵo, miksado de sablo, kalko ktp kaj fandado de tiu miksaĵo al flua vitromaso.[53] En la unua fazo laboras diversaj partlaboristoj, same en la fina fazo, la prenado de la boteloj el la sekigofornoj, ilia ordigo laŭ specoj, enpakado ktp. Inter la du fazoj staras meze la vera vitrofarado aŭ prilaborado de la flua vitromaso. Ĉe la sama buŝo de vitroforno laboras grupo, kiu en Anglio nomiĝas la „*hole*” (truo) kaj konsistas el botelfaristo aŭ finfaristo (*bottle maker* aŭ *finisher*), blovisto (*blower*), kolektisto (*gatherer*), stakisto aŭ derompisto (*putter up* aŭ *whetter off*) kaj deprenisto (*taker in*). Tiuj kvin partlaboristoj

---

52 „Kiam, laŭ la aparta naturo de la produktoj de ĉiu manufakturo, oni eksciis la plej avantaĝan manieron fendi la fabrikadon en partajn operaciojn kaj ankaŭ la necesan nombron da laboristoj por ili, tiam ĉiuj establoj kiuj ne aplikas precizan oblon de tiu nombro, produktadas kun pli da kostoj … Tio estas unu el la kaŭzoj de la ega etendiĝo de la industriaj establoj.” (Ch. Babbage, On the Economy of Machinary, Londono, 1832, ĉap. XXI, p. 172, 173)

53 En Anglio la fandforno estas disigita de la vitroforno, ĉe kiu oni faras la vitraĵon, en Belgio ekz-e la sama forno servas por ambaŭ procezoj.

konsistigas same multajn apartajn organojn de unu sama laborkolektivo, kiu povas efiki nur kiel unuo, do nur per rekta kunlaborado de la kvin. Se unu membro de la kvinparta kolektivo mankas, tiam ĝi estas paralizita. Sed la sama vitroforno havas diversajn buŝojn, en Anglio ekz-e kvar ĝis ses, kies ĉiu havas en si argilan fandkrisolon kun flua vitro kaj kies ĉiu laborigas propran samforman kvinopan laboristgrupon. La organiziĝo de ĉiu tia grupo baziĝas rekte sur la labordivido, dum la ligo inter la diversaj samspecaj grupoj estas simpla kunlaborado, kiu konsumas unu el la produktadrimedoj, ĉi tie la vitrofornon, pli ŝpare per komuna konsumo. Tia vitroforno kun siaj kvar ĝis ses grupoj konsistigas vitrofarejon, kaj vitromanufakturo entenas plurajn tiajn vitrofarejojn, samtempe kun la instalaĵoj kaj la laboristoj por la preparaj kaj finaj produktadfazoj.

Fine, la manufakturo, tia kia ĝi fontas parte el la kombinado de diversaj metioj, povas evolui al kombinado de diversaj manufakturoj. La iom grandaj anglaj vitrofarejoj ekz-e fabrikas siajn argilajn krisolojn mem, ĉar de ties kvalito dependas esence la sukceso aŭ malsukceso de la produkto. La manufakturo de produktadrimedo estas ĉi tie ligita kun la manufakturo de la produkto. Inverse la manufakturo de la produkto kunligeblas kun manufakturoj en kiu ĝi siavice servas kiel krudmaterialo aŭ kun kies produktoj ĝi estas poste kunmetota. Ekzemple oni trovas la manufakturon de flintvitro kombinita kun la vitroŝlifejo kaj la kuprofandejo, tiu por metalaj muntadoj aŭ enkadrigoj de diversaj vitraj artikloj. La diversaj kombinitaj manufakturoj konsistigas tiam pli aŭ malpli space disajn departementojn de tuta manufakturo, kun produktadprocezoj kiuj estas samtempe sendependaj unu de la alia, ĉiu kun propra labordivido. Malgraŭ diversaj avantaĝoj de la kombinita manufakturo, ĝi sur propra bazo ne akiras vere teĥnikan unuecon. Tiu estiĝas nur ĉe ĝia transformado en maŝinan sistemon.

La periodo de manufakturo, kiu baldaŭ deklaras la malpliigon de la labortempo necesa por la varproduktado kiel konscian principon,[54] disvolvas sporade ankaŭ la uzadon de maŝinoj, ĉefe por certaj simplaj unuaj procezoj plenumeblaj amase kaj per uzado de granda forto. Ekzemple en la papermanufakturo la disŝirado de la ĉifonaĵoj estas baldaŭ farata per papermueliloj kaj en la metalurgio la dispremado de la ercoj per tiel nomataj pistmueliloj.[55] La elementan formon de ĉia maŝinaro la romia

54 Tio videblas interalie el W. Petty, John Bellers, Andrew Yarranton: The Advantages of the East-India Trade kaj J. Vanderlint.

55 Ankoraŭ fine de la 16-a jarcento oni uzas en Francio pistujojn kaj kribrilojn por dispecigi kaj lavi la ercojn.

imperio transdonis en la formo de akvomuelilo.[56] La metia periodo heredigis la grandajn inventojn de kompaso, de pulvo, de libropresado kaj de la aŭtomata horloĝo. Sed ĝenerale la maŝinoj ludis flankan rolon, kiun Adam Smith atribuas al ĝi apud la labordivido.[57] La sporada uzado de maŝinoj en la 17-a jarcento fariĝis grava, ĉar ĝi donis al la grandaj matematikistoj de tiu tempo praktikan bazon kaj simulon por kreado de la moderna meĥaniko.

La specifa maŝinaro de la manufakturperiodo restas la ĉiomlaboristo mem kombinita el multaj partlaboristoj. La diversaj operacioj, kiujn la produktanto de varo plenumas sinsekve kaj kiuj interplektiĝas en la tutaĵo de lia laborprocezo, okupas lin diversmaniere. En iu li devas uzi pli da forto, en la alia pli da lerteco, en la tria pli da mensa atento ktp, kaj la sama individuo posedas tiujn ecojn ne samgrade. Post la disigo, memstarigo kaj izolado de la diversaj operacioj, la laboristoj estas dividitaj, klasitaj kaj grupitaj laŭ siaj precipaj ecoj. Dum la naturaj talentoj estas la bazoj sur kiu la labordivido estiĝas, la manufakturo, post kiam ĝi enkondukiĝis, disvolvas laborfortojn kiuj taŭgas nature nur al unuflanka aparta funkcio. La ĉiomlaboristo posedas nun ĉiujn produktajn ecojn en same alta grado de virtuozeco kaj elspezas ilin samtempe plej ŝpareme, per tio ke li uzas ĉiujn siajn organojn, individuigitajn en apartajn laboristojn aŭ laboristajn grupojn, ekskluzive al iliaj specifaj funkcioj.[58] Unuflankeco

56 La tuta evoluhistorio de la maŝinaro sekveblas en la historio de la grenmueliloj. La fabriko nomiĝas en la angla daŭre muelilo (*mill*). En germanaj teĥnologiaj verkoj el la unuaj jardekoj de la 19-a jarcento oni trovas ankoraŭ la esprimon muelilo (*Mühle*) ne nur por ĉia maŝinaro funkciigata per naturfortoj, sed eĉ por ĉiaj manufakturoj kiuj uzas maŝinecajn aparatojn.

57 Kiel pli detale videblos el la Kvara Libro de tiu ĉi verko, A. Smith eldiris eĉ ne unu novan frazon pri la labordivido. Sed kio karakterizas lin kiel la resuman politikan ekonomikiston de la manufakturperiodo, estas la emfazo kiun li donas al la labordivido. La subordigita rolo, kiun li atribuas al la maŝinaro, provokis dum la komenco de la granda industrio la kritikon de Lauderdale, en ĝia pli evoluinta epoko la polemikon de Ure. A. Smith konfuzas ankaŭ la diferencigon de la laborinstrumentoj, ĉe kiu la partlaboristoj de la manufakturo estis mem tre aktivaj, kun la maŝininventado. En tiu ludas rolon ne la manufakturlaboristoj, sed kleruloj, metiistoj, eĉ terkulturistoj (Brindley) ktp.

58 „Per tio ke oni dividas la laboron en plurajn diversajn operaciojn, kiu ĉiu postulas diversajn gradojn da lerteco kaj da forto, la manufakturmastro povas akiri precize tian kvanton da forto kaj da lerteco, kian ĉiu operacio postulas. Sed se la tuta laboro farendus de unu laboristo, tiam la sama individuo devus posedi sufiĉe da lerteco por la plej delikataj kaj sufiĉe da forto por la plej penigaj operacioj." (Ch.Babbage, l.c., ĉap. XIX)

kaj eĉ la malperfekteco de la partlaboristo fariĝas lia perfekteco kiel membro de la ĉiomlaboristo.[59] La kutimo de unuflanka funkcio transformas lin en sian nature senmanke funkciantan organon, dum la kunteniĝo de la tuta meĥanismo devigas lin efiki kun la reguleco de maŝinparto.[60]

Ĉar la diversaj funkcioj de la ĉiomlaboristo estas pli simplaj aŭ pli kompleksaj, pli malaltaj aŭ pli altaj, ĝiaj organoj, la individuaj laborfortoj, bezonas do tre diversajn gradojn de elformiĝo kaj posedas do tre diversajn valorojn. La manufakturo disvolvas do hierarĥion de la laborfortoj, kiu kongruas kun skalo de salajroj. Dum unuflanke la individua laboristo estas alproprigita al limigita funkcio kaj dumvive al ĝi aneksita, aliflanke la diversaj labor-operacioj estas adaptitaj al tiu hierarĥio de la naturaj kaj akiritaj talentoj.[61]

Tamen ĉiu produktadprocezo postulas certajn simplajn manipuladojn kiujn ĉiu ajn kapablas. Ankaŭ tiuj manipuladoj estas nun disigitaj de sia flua kunteniĝo kun la pli intensaj fazoj de la agado kaj ŝtonigitaj al ekskluzivaj funkcioj.

La manufakturo produktas do, en ĉiu metio kiun ĝi alprenas, klason de tiel nomataj nelertaj laboristoj, kiujn la metia sistemo strikte ekskludis. Kiam ĝi disvolvas la tute unuflankan specialecon surkoste de la kompleta laborkapablo al virtuozeco, ĝi ankaŭ jam komencas fari specialecon el la manko de ĉia evoluo. Apud la hierarĥia gradigo aperas la simpla distingo

59 Ekzemple unuflanka muskoldisvolviĝo, osta kurbiĝo ktp.

60 Tute ĝuste s-ro Wm. Marshall, ĝenerala direktoro de vitrofarejo, respondas al demando farita de la enket-komisaro, kiel la laboremo estas konservata ĉe la laborigataj knaboj: „Ili tute ne povas neglekti sian laboron; ekde kiam ili komencis labori, ili devas ankaŭ daŭrigi ĝin; ili estas tute kiel partoj de maŝino.” (Child Empl. Comm., Fourth Report, 1865, p. 247)

61 D-ro Ure en sia apoteozo de la granda industrio sentas la apartajn karakterojn de la manufakturo pli forte ol antaŭaj ekonomikistoj, kiuj ne havis lian polemikan intereson, kaj eĉ ol liaj samtempuloj, ekz-e Babbage, kiu ja superis lin kiel matematikisto kaj meĥanikisto, tamen komprenas la grandan industrion envere nur el la vidpunkto de la manufakturo. Ure notas: „La alproprigo de la laboristoj al ĉiu aparta operacio estas la esenco de la disdivido de la laboroj.” Aliflanke li nomas tiun disdividon „adaptado de la laboroj al la diversaj individuaj kapabloj” kaj fine karakterizas la tutan manufaktursistemon kiel „sistemon de gradigoj laŭ la rango de la lerteco”, kiel „dividon de la laboro laŭ la diversaj gradoj de la lerteco” ktp. (Ure: Philos. of Manuf., vol. 1, p. 19-23 diversl.)

inter lertaj kaj nelertaj laboristoj. Por la lastaj tute forestas elspezoj por lernado, por la unuaj ili malaltiĝas, kompare kun la metiisto, pro la simpligita funkcio. En ambaŭ kazoj la valoro de la laborforto malaltiĝas.[62]

Escepto okazas, kiam la disigo de la laborprocezo kreas novajn ĝeneralajn funkciojn, kiuj ne aŭ ne sam-amplekse ekzistis en la metia sistemo. La relativa malplivalorigo de la laborforto, kiu fontas el la foresto aŭ malaltiĝo de la lernadkostoj, rekte inkludas pli altan plivalorigon de la kapitalo, ĉar ĉio, kio mallongigas la tempon necesan por reproduktado de la laborforto, longigas la kampon de la pluslaboro.

# 4. Labordivido ene de la manufakturo kaj labordivido ene de la socio

Ni rigardis unue la originon de la manufakturo, poste ĝiajn simplajn elementojn, la partlaboriston kaj lian ilon, fine ĝian tutan meĥanismon. Ni tuŝas nun mallonge la rilaton inter la manufaktura labordivido kaj la socia labordivido, kiu konsistigas la ĝeneralan bazon de ĉia varproduktado.

Se oni konsideras nur la laboron mem, tiam oni povas nomi la disigon de la socia produktado en ĝiaj grandaj branĉoj, industrio, kampkulturo ktp, kiel ĝeneralan labordividon, la apartigon de tiuj produktadaj branĉoj en specojn kaj subspecojn kiel apartan labordividon, kaj la labordividon ene de laborejo kiel unuopan labordividon.[63]

La labordivido ene de la socio kaj la responda limiĝo de la individuoj al apartaj profesiaj kampoj, evoluas, kiel la labordivido ene de la manufakturo, el kontraŭaj elirpunktoj. Ene de familio, plu evoluinta en tribo,[64] la

62 „Ĉiu metiisto, kiu … estis kapabligita perfektiĝi per la praktiko en unuopa manipulo … fariĝis pli malmultekosta laboristo.” (Ure, saml., p. 19)

63 „La labordivido iras de la disigo de la plej diversaj profesioj ĝis tiu divido, kie pluraj laboristoj dividas la fabrikadon de unu sama produkto, kiel en la manufakturo.” (Storch, l.c., p. 173) „Ni renkontas ĉe la popoloj kiuj atingis certan ŝtupon de civilizacio, tri specojn de labordivido: la unua, kiun ni nomas la ĝeneralan, distingas la produktistojn laŭ kampkulturistoj, metiistoj kaj komercistoj, ĝi kongruas kun la tri ĉefaj branĉoj de la nacia laboro; la dua, kiun oni povus nomi la apartan, estas la divido de ĉiu laborbranĉo en specojn … la tria labordivido fine, kiun oni prefere nomu proprasence labordividon, estas tiu, kiu elformiĝas en la diversaj metioj kaj profesioj … kaj realiĝas en la plej multaj manufakturoj kaj laborejoj.” (Skarbek, l.c., p. 84, 85)

64 *Noto al la 3-a eldono:* Postaj tre ĝisfundaj studoj de la homaj prakondiĉoj kondukis la aŭtoron al la konkludo, ke origine ne la familio elformĝis al tribo,

sponta labordivido fontas el la malsameco de sekso kaj de aĝo, do sur pure korpa bazo, kiu etendas sian materialon kun la etendo de la komunumo, la pliiĝo de la loĝantaro kaj ĉefe kun la konflikto inter diversaj triboj kaj la subjugado de unu tribo fare de la alia. Aliflanke, kiel mi rimarkigis jam antaŭe[65], la interŝanĝado de produktoj estiĝas tie, kie diversaj familioj, triboj, komunumoj kontaktiĝas, ĉar ne privataj personoj, sed familioj, triboj ktp memstare alpaŝas unu la alian en la komencoj de la kulturo. Diversaj komunumoj trovas en sia natura ĉirkaŭaĵo diversajn produktadrimedojn kaj diversajn nutraĵojn. Iliaj produktadmaniero, vivmaniero kaj produktoj estas do malsamaj. Estas tiu nature sponta diverseco kiu ĉe la kontakto de la komunumoj kaŭzas la interŝanĝon de la reciprokaj produktoj kaj pro tio la iom-post-ioman transformadon de tiuj produktoj en varojn. La interŝanĝo ne kreas la diferencon inter la produktadsferoj, sed rilatigas tiujn kiuj jam estas diversaj kaj tiel transformas ilin en pli aŭ malpli interdependajn branĉojn de la socia ĉiomproduktado. Ĉi tie estiĝas la socia labordivido per la interŝanĝado de origine malsamaj, sed inter si sendependaj produktadsferoj. Tie, kie la korpa labordivido estas la elirpunkto, male, la apartaj organoj de kompakta tutaĵo disiĝas unu de la alia, malkomponiĝas, precipe pro la impulso kiun donas la interŝanĝado kun fremdaj komunumoj, kaj izoliĝas tiagrade ke la ligo inter la diversaj laboroj konserviĝas nur per la interŝanĝado de iliaj produktoj. En la unua kazo estas la dependiĝo de la antaŭe sendependaj, en la alia la sendependiĝo de la antaŭe dependaj.

La bazo de ĉia evoluinta kaj de varinterŝanĝo perata labordivido estas la disigo de urbo kaj kamparo.[66] Oni povas diri, ke la tuta ekonomia historio de la socio resumiĝas en la moviĝo de tiu kontraŭdiro, kiun ni

---

sed inverse, ke la tribo estis la origina kaj sponta formo de la homa sociigo bazita sur sangparenco, tiel ke el la komenciĝanta dissolviĝo de la tribaj ligoj nur poste evoluis la multaj diversaj formoj de la familio. - F. Engelso} – Vidu pri tio Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-16-8 -vl

65 Vd file:///mnt/win_c/Users/vilhelmo/Desktop/www.mlwerke.de/me/me23/me23_099.htm#S102

66 Sir James Steuart plej bone pritraktis tiun punkton. Kiom malmulte lia verko, aperinta dek jarojn antaŭ la „Wealth of Nations”, estas nuntempe konata, tio videblas el tio ke la admirantoj de Maltuso eĉ ne scias ke tiu en la unua eldono de sia skribaĵo pri la „Population”, aparte de la pure deklama parto, kopias krom la pastrojn Wallace kaj Townsend preskaŭ nur Steuart-on.

tamen ĉi tie ne pritraktos.

Kiel por la labordivido ene de la manufakturo certa nombro da samtempe okupataj laboristoj estas la materia kondiĉo, tiel la grando de la loĝantaro kaj ties denso, kiu anstataŭas la laboristojn en la laborejo, estas necesa kondiĉo por la labordivido en la socio.[67] Tamen tiu denso estas io relativa. Relative malmulte priloĝata lando kun disvolvitaj komunikadrimedoj posedas pli densan loĝantaron ol pli priloĝata lando kun neevoluintaj komunikrimedoj, kaj tiusence la nordaj ŝtatoj de Usono estas ekzemple pli dense priloĝataj ol Hindio.[68]

Ĉar varproduktado kaj varcirkulado estas la ĝenerala kondiĉo de la kapitalisma produktadmaniero, manufaktura labordivido postulas jam ĝis certa evolugrado maturiĝintan labordividon ene de la socio. Inverse la manufaktura labordivido disvolvas kaj multobligas retroefike tiun socian labordividon. Kun la diferencigo de la laboriloj la metioj pli kaj pli diferenciĝas, kiuj produktas tiujn ilojn.[69] Se la manufaktura sistemo kaptas metion, kiu ĝis tiam kuntenis kiel ĉefa aŭ flanka metio kun aliaj kaj kiu estis organizita de la sama produktisto, tiam okazas tuj disiĝo kaj reciproka sendependiĝo. Se ĝi kaptas apartan produktadŝtupon de varo, tiam ĝiaj diversaj produktadŝtupoj transformiĝas en sendependajn metiojn. Ni jam rimarkigis ke tie, kie la artiklo estas nur meĥanike kunmetita tutaĵo de partaj produktoj, la partlaboroj povas siavice sendependiĝi al propraj metioj. Por plej perfekte plenumi la labordividon ene de manufakturo, la sama produktadbranĉo, laŭ la diverseco de siaj krudmaterialoj aŭ laŭ la diversaj formoj kiujn la sama krudmaterialo povas ricevi, estas fendata en diversajn, parte tute novajn manufakturojn. Ekzemple jam en la unua duono de la 18-a jarcento oni teksis sole en Francio pli ol cent diversajn silkteksaĵojn, kaj en Avinjono ekzemple estis

67 „Certa denso de loĝantaro estas taŭga por la socia interrilato kiel ankaŭ por tiu kunefikado de tiuj fortoj per kiu la rezulto de la laboro pliiĝas.” (James Mill, l.c., p. 50) „Se la nombro da laboristoj kreskas, kreskas la produktivo de la socio en la sama proporcio al tiu kresko, obligita per la efiko de la labordivido.” (Th. Hodgskin, l.c., p. 120)

68 Sekve al la granda postulo de kotono ekde 1861, en kelkaj cetere multe priloĝataj distriktoj de Orienta Hindio oni etendis la kotonproduktadon surkoste de la rizproduktado. Pro tio estiĝis malsatmizero en parto de la lando, ĉar pro mankantaj komunikiloj kaj per tio pro mankanta materia kunteniĝo la manko da rizo en iu distrikto ne kompenseblis per sufiĉe rapida venigo de rizo el aliaj distriktoj.

69 Ekzemple la fabrikado de la teksistaj navedoj estis jam dum la 17-a jarcento aparta industribranĉo en Nederlando.

leĝo, ke *„ĉiu metilernanto rajtis dediĉi sin ĉiam nur al unu fabrik-admaniero kaj neniam rajtis lerni la teksadon de pluraj ŝtofoj”*. La teritoria labordivido, kiu fiksas apartajn produktadbranĉojn al apartaj distriktoj de lando, ricevas novan impeton per la manufaktura sistemo, kiu ekspluatas ĉiajn apartaĵojn.[70] Fine la etendo de la mondmerkato kaj la kolonisistemo, kiuj estas parto de la ĝeneralaj ekzistkondiĉoj de la manufakturperiodo, liveras al tiu riĉan materialon por la labordivido en la socio. Ĉi tie ne estas la loko por detale pruvi, kiel ili kaptas apud la ekonomia ĉian alian sferon de la socio kaj metas ĉie la bazon por tiu elformado de la fakeco, de la specialecoj, kaj de dispecigo de la homo, kiu igis jam A. Ferguson, la instruiston de A. Smith, elkrii: „Ni faras nacion de helotoj, kaj ne havas liberajn civitanojn inter ni.”[71]

Sed malgraŭ la multaj analogaĵoj kaj rilatoj inter la labordivido en la socio kaj la divido ene de laborejo, la du estas ne nur grade, sed esence malsamaj. La analogio ŝajnas plej okulfrapa, kie interna ligo kunigas diversajn metiajn branĉojn. La brutbredisto ekz-e produktas haŭtojn, la tanisto transformas la haŭtojn en ledon, la ŝuisto la ledon en botojn. Ĉiu produktas ĉi tie ŝtupan produkton, kaj la lasta preta formo estas la kombinita produkto de iliaj apartaj laboroj. Aldoniĝas la multspecaj laborbranĉoj, kiuj liveras al la bredisto, tanisto, ŝuisto produktadrimedojn. Oni povas nun iluzii kun A. Smith, ke tiu socia labordivido distingiĝas de la manufaktura nur subjektive, nur por la observanto, kiu en la manufakturo kaptas per unu vido la multspecajn partlaborojn en spaca kunesto, dum en la socia divido ilia diseco tra grandaj spacoj kaj la granda nombro da laborantoj en ĉiu aparta branĉo malheligas la kunteniĝon.[72] Sed kio

70 „Ĉu la lanmanufakturo de Anglio ne estas disigita en diversajn partojn, kiuj fiksiĝis en apartaj lokoj, kie ili estas sole aŭ ĉefe produktataj; *fajnaj tukoj en* Somersetshire, *malfajnaj* en Yorkshire, *duoble larĝaj* en Exeter, *silko* en Sudbury, *krepoj* en Norwich, *duonlanaĵoj* en Kendal, *kovriloj* en Whitney ktp!” (Berkeley: The Querist, 1750, § 520)

71 A. Ferguson: History of Civil Society, Edinburgo, 1767, parto IV, sekcio II, p. 285)

72 En la veraj manufakturoj, diras li, la labordivido ŝajnas pli granda, ĉar „la laborantoj en ĉiu unuopa laborbranĉo povas ofte esti kunaj en labordomo kaj unuvide videblaj por la observanto. Sed, male, en tiuj grandaj manufakturoj (!), kiuj estas destinitaj kontentigi la ĉefajn bezonojn de la granda amaso de la loĝantaro, en ĉiu unuopa laborbranĉo estas laborantaj tiom multe da laboristoj, ke maleblas kunigi ilin en unu labordomon … la divido estas multe malpli videbla.” (A. Smith: „Wealth of Nations”, libro 1, ĉap. 1) La fama tekstero en la sama ĉapitro, kiu komenciĝas per la vortoj: „Observu en civilizita kaj flor-

faras la ligon inter la sendependaj laboroj de bredisto, tanisto, ŝuisto? La ekzisto de iliaj respektivaj produktoj kiel varoj. Kio karakterizas, male, la manufakturan labordividon? La fakto ke la partlaboristo ne produktas varon.[73] Nur la komuna produkto de la partlaboristoj transformiĝas en varon.[74] La labordivido en la socio estas perata de aĉeto kaj vendo de la produktoj de diversaj laborbranĉoj, la ligo de la partlaboroj en la manufakturo estas perata de la vendo de diversaj laborfortoj al la sama kapitalisto, kiu uzas ilin kiel kombinitan laborforton. La manufaktura labordivido implicas koncentriĝon de la laborrimedoj en la mano de unu kapitalisto, la socia labordivido implicas disecon de la produktadrimedoj inter multaj inter si sendependaj varproduktistoj. Anstataŭ la fera leĝo de proporcia nombro aŭ proporcieco, kiu en la manufakturo subigas difinitajn kvantojn da laboristoj sub difinitaj funkcioj, en la socia labordivido hazardo kaj arbitro faras sian buntan ludon en la distribuado de la varproduktistoj kaj iliaj produktadrimedoj inter la diversaj sociaj laborbranĉoj. Kvankam la diversaj produktadsferoj provas konstante ekvilibriĝi, per

anta lando la havaĵon de la plej ordinara metiisto aŭ taglaboristo ktp” kaj poste pentras la bildon de la sennombraj kaj variaj laboroj kiuj kune kontribuas al kontentigo de la bezonoj de ordinara laboristo, estas sufiĉe laŭvorte kopiita el la rimarkoj de B. de Mandeville pri sia „Fable of the Bees, or, Private Vices, Publick Benefits”. (Unua eldono sen la rimarkoj 1705, kun la rimarkoj 1714)

73 „Sed jam ekzistas nenio kio nomeblas la natura rekompenco de la unuopa laboristo. Ĉiu laboristo produktas nur parton de tutaĵo, kaj ĉar ĉiu parto por si estas sen valoro aŭ utilo, ekzistas nenio kion la laboristo povus preni kaj diri: Jen mia produkto, tiun mi volas konservi por mi.” („Labour defended against the claims of Capital”, Londono, 1825, p. 25) La aŭtoro de tiu bonega skribaĵo estas la antaŭe citita Th. Hodgskin.

74 *Noto al la 2-a eldono:* Tiu diferenco inter socia kaj manufaktura labordivido estis praktike ilustrita al la jankioj. Unu el la impostoj nove elkovitaj dum la interna milito en Vaŝingtono estis la 6-elcenta imposto por „ĉiaj industriaj produktoj”. Demando: Kio estas industria produkto? Respondo de la leĝdonanto: Aĵo estas produktita, „kiam ĝi estas farita” (when it is made), kaj ĝi estas farita, kiam ĝi estas preta pro vendo. Nun unu ekzemplon el multaj. Manufakturoj en Novjorko kaj Filadelfio „faris” antaŭe pluvombrelojn kun ĉiaj akcesoraĵoj. Sed ĉar pluvombrelo estas kunmetita miksaĵo el tute malhomogenaj partoj, tiuj fariĝis iom post iom produktoj sendependaj unu de la alia kaj en metiaj branĉoj en diversaj lokoj. Iliaj partproduktoj eniris nun kiel sendependaj varoj en la manufakturon de pluvombreloj, kiu nun nur kunmetis ilin al tutaĵo. La jankioj nomis tiajn artiklojn „assembled articles” (kunmetitaj artikloj), kaj tiuj meritis tiun nomon ĉefe kiel kunmetejoj de impostoj. Tiel la pluvombrelo „kunmetis” unue 6 elcentojn da imposto por la prezo de ĉiu sia elemento kaj ree 6 elcentojn por sia propra tutaĵa prezo.

tio ke unuflanke ĉiu varproduktisto devas produkti uzvaloron, do kontentigi apartan socian bezonon, la amplekso de tiuj bezonoj estas kvante diversa kaj interna ligo kuntenas la diversajn bezonkvantojn al nature sponta sistemo; per tio ke aliflanke la valorleĝo de la varoj determinas, kiom la socio povas elspezi el sia tuta disponebla labortempo por la produktado de ĉiu unuopa varspeco. Sed tiu konstanta tendenco de la diversaj produktadsferoj ekvilibriĝi ekfunkcias nur kiel reago kontraŭ la konstanta neniigo de tiu ekvilibro. La regulo apriore kaj laŭplane obeata ĉe la labordivido ene de la laborejo efikas ĉe la labordivido en la socio nur aposteriore kiel interna, muta naturneceso kiu percepteblas nur en la barometraj fluktuadoj de la merkatprezoj kaj kiu superfortas la senregulan arbitrecon de la varproduktistoj. La manufaktura labordivido implicas la nepran aŭtoritaton de la kapitalisto super homoj, kiuj estas nur partoj de tuta meĥanismo apartenanta al li; la socia labordivido rilatigas sendependajn varproduktistojn, kiuj agnoskas nenian alian aŭtoritaton ol tiun de la konkurenco, la devigo kiun la premo de iliaj reciprokaj interesoj efikas sur ili, kiel ankaŭ en la animala regno la milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj[75] pli aŭ malpli konservas la ekzistadkondiĉojn de ĉiuj specioj. La sama burĝa konscio, kiu celebras la manufakturan labordividon, la vivolongan aneksiĝon de la laboristo al detala manipulo kaj la nepran subordiĝon de la partlaboristoj sub la kapitalon kiel organizadon de la laboro kiu pliigas ties produktoforton, denuncas do same laŭte ĉian konscian socian kontroladon kaj reguladon de la socia produktadprocezo kiel intervenon en la netuŝeblaj rajtoj de proprieto, libereco kaj la sin mem determinanta „genieco" de la individua kapitalisto. Estas tre karakterize ke la entuziasmaj apologiistoj de la fabriksistemo scias diri nenion pli kondamnan kontraŭ ĉia ĝenerala organizado de la socia laboro ok ke ĝi transformus la tutan socion en fabrikon.

Dum la anarĥio de la socia kaj la despoteco de la manufaktura labordivido kondiĉas unu la alian en la socio de la kapitalisma produktadmaniero, male, fruaj sociaj formoj, en kiuj la apartiĝo de la metioj evoluis sponte, kristaliĝis poste kaj fine fiksiĝis leĝe, prezentas unuflanke la bildon de laŭplana kaj laŭaŭtoritata organizado de la socia laboro, kaj aliflanke ekskludas la labordividon ene de laborejo tute aŭ evoluigas ĝin nur etskale sporade kaj hazarde.[76]

---

75 Laŭ Hobbes, latine *bellum omnium contra omnes*. -vl

76 „Oni povas formuli kiel ĝeneralan regulon: Ju malpli la aŭtoritato prezidas la labordividon en la socio, des pli la labordivido evoluas ene de la laborejo kaj des pli ĝi estas submetita al la aŭtoritato de unuopulo. Laŭ tio, la aŭtoritato en

Tiuj praaj, etaj hindiaj komunumoj ekz-e, kiuj parte ankoraŭ daŭre ekzistas, baziĝas sur komuna posedo de la grundo, sur senpera ligo inter kampkulturo kaj metio kaj sur neŝanĝebla labordivido, kiu servas, kiam oni estigas novan komunumon, kiel donita plano kaj modelo. Ili konsistigas produktadajn tutaĵojn kiuj sufiĉas al si mem, sur produkta surfaco de cent ĝis plurmil akreoj[77]. La ĉefa kvanto da produktoj estas produktata por la senpera membezono de la komunumo, ne kiel varo, kaj la produktado mem okazas do sendepende de la labordivido perata de la varinterŝanĝo ĝenerale de la hindia socio. Nur la kromaĵo de la produktoj transformiĝas en varon, parte siavice nur en la mano de la ŝtato, al kiu difinita kvanto de pratempo fluas kiel naturrento. Diversaj partoj de Hindio havas diversajn formojn de komunumo. En la plej simpla formo la komunumo prilaboras la kampon komune kaj dividas siajn produktojn inter siaj membroj, dum ĉiu familio praktikas ŝpinadon, teksadon ktp kiel hejman flankmetion. Apud tiu samspece okupata amaso ni trovas la „ĉefan loĝanton”, juĝiston, policiston kaj impostkolektiston en unu persono; la libroteniston, kiu faras la kontadon pri la kampkulturado kaj ĉion tiurilatan katastras kaj registras; oficiston kiu persekutas krimulojn kaj protektas fremdajn vojaĝantojn kaj kondukas ilin de unu vilaĝo al la alia; la limgardiston, kiu gardas la limojn de la komunumo kontraŭ la najbaraj komunumoj; la akvokontroliston, kiu disdonas la akvon el la komuna akvujo por kampkulturaj celoj; la bramanon kiu plenumas la funkciojn de la religia kulto; la instruiston, kiu instruas la infanojn de la komunumo skribi en la sablo kaj legi; la kalendaran bramanon, kiu kiel astrologo indikas la tempojn por semado, rikoltado kaj la bonajn kaj malbonajn horojn por ĉiuj apartaj kampkulturaj laboroj; forĝiston kaj ĉarpentiston, kiuj faras kaj riparas ĉiujn kampkulturajn ilojn; la potiston, kiu faras ĉiujn ujojn por la vilaĝo; la friziston, la laviston por purigado de la vestaĵoj, la arĝentforĝiston, ie kaj tie la poeton, kiu en kelkaj komunumoj anstataŭas la arĝentforĝiston, en aliaj la instruiston. Tiuj kelkaj personoj estas vivtenataj surkoste de la tuta komunumo. Se la loĝantaro kreskas, oni setligas novan komunumon laŭ la modelo de la malnova sur nekulturita grundo. La komunuma meĥanismo montras laŭplanan labordividon, sed ĝia manufaktura divido maleblas, ĉar la merkato por forĝisto, ĉarpentisto ktp restas

la laborejo kaj tiu en la socio staras, koncerne la labordividon, en inversa proporcio unu al la alia.” (Karlo Markso: Mizero de la filozofio, Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero”, kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin, Pri J. P. Prudono (Letero al J. B. v. Schweitzer), tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-918300-08-3, p. 147)

77 Akreo = 0,405 hektaro. Do, de 40,5 ĝis pluraj 400 hektaroj.

senŝanĝa kaj ĉar maksimume, laŭ la grandodiferenco de la vilaĝoj, ekzistas, anstataŭ unu forĝisto, potisto ktp du aŭ tri da ili.[78] La leĝo, kiu reguligas la dividon de la komunuma laboro, efikas tie kun la nerompebla aŭtoritato de naturleĝo, dum ĉiu aparta metiisto, ekz-e forĝisto ktp, laŭtradicie, sed sendepende kaj sen agnosko de ajna aŭtoritato en sia laborejo, plenumas ĉiujn operaciojn kiuj apartenas al lia fako. La simpla produkta organismo de tiuj memsufiĉaj komunumoj, kiuj konstante reproduktiĝas en la sama formo kaj, se hazarde detruitaj, rekonstruiĝas samloke kun la sama nomo,[79] liveras al ni la ŝlosilon por la sekreto de la neŝanĝemo de la aziaj socioj, kio tiom kontrastas kun la konstanta dissolviĝo kaj novformiĝo de aziaj ŝtatoj kaj la senhalta ŝanĝo de la dinastioj. La strukturo de la ekonomiaj bazaj elementoj de la socio restas netuŝita de la ŝtormoj el la politika nubregiono.

La gildaj leĝoj, kiel jam antaŭe menciite, per ekstrema limigo de la nombro da submajstroj kiujn unuopa gilda majstro rajtis laborigi, laŭplane malebligis lian transformiĝon en kapitaliston. Li rajtis ankaŭ nur dungi submajstrojn ekskluzive en la metio en kiu li estis mem majstro. La gildo ĵaluze defendis sin kontraŭ ĉia interveno de la komerca kapitalo, la sola libera formo de kapitalo kiu kontraŭstaris al ĝi. La komercisto povis aĉeti ĉiajn varojn, nur ne la laboron kiel varon. Li estis tolerata nur kiel distribuisto de la metiaj produktoj. Se eksteraj cirkonstancoj kaŭzis plian labordividon, tiam ekzistantaj gildoj fendiĝis en subgildojn aŭ novaj gildoj aperis apud la malnovaj, sed sen kunmeto de diversaj metioj en unu laborejon. La gilda organizaĵo, kvankam ĝia apartigo, izoligo kaj formado de la metioj apartenas al la materiaj ekzistadkondiĉoj de la manufaktura periodo, ekskludis do la manufakturan labordividon. Ĝenerale la laboristo kaj liaj produktiloj restis kunligitaj kiel la heliko kun sia helikdomo, kaj

78 Lieut. Col. Mark Wilks: „Historical Sketches on the South of India”, Londono, 1810 ĝis 1817, vol. 1, p. 118-120. Bona priskribo de la diversaj formoj de la hindia komunumo troviĝas en George Campbell: „Modern India”, Londono, 1852.

79 „En tiu simpla formo … la loĝantoj de la lando vivis de pratempo. La limoj de la vilaĝaj teritorioj estis nur malofte ŝanĝitaj; kaj kvankam la vilaĝoj estis plagitaj de milito, malsatego kaj epidemioj, kaj eĉ totale neniigitaj, la sama nomo, la samaj limoj, la samaj interesoj kaj eĉ la samaj familioj trudis sin tra generacioj. La loĝantoj ne lasis sin impresi de la kolapso kaj divido de reĝlandoj; tiom longe, kiom la vilaĝo restas ne dividita, ili indiferentas pri tio, al kiu potenco ĝi estas cedita aŭ al kiu reganto ĝi alfalas. Ĝia interna ekonomio restas senŝanĝa.” (Th. Stamfort Raffles, late Lieut. Gov. of Java: „The History of Java”, Londono, 1817, vol. 11, p. 285, 286) [fontindiko laŭ -fr]

tiel do mankis la unua bazo de la manufakturo, la sendependiĝo de la produktiloj kiel kapitalo fronte al la laboristo.

Dum la labordivido en la tutaĵo de socio, ĉu perata aŭ ne de la varinterŝanĝo, apartenas al la plej diversaj ekonomiaj sociformacioj, la manufaktura labordivido estas tute specifa kreaĵo de la kapitalisma produktadmaniero.

## 5. La kapitalisma karaktero de la manufakturo

Iom sufiĉe granda nombro da laboristoj sub la komando de la sama kapitalo estas la sponta elirpunkto de la kunlaborado entute kaj ankaŭ de la manufakturo. Inverse la manufaktura labordivido disvolvas la kreskadon de la nombro de la uzataj laboristoj al teĥnika neceso. La minimumon da laboristoj, kiun unuopa kapitalisto devas uzi, preskribas al li nun la ekzistanta labordivido. Aliflanke la avantaĝoj de plua divido estas kondiĉitaj de plua pliigo de la nombro da laboristoj, farebla nur per obligado. Sed kun la varia devas kreski ankaŭ la konstanta parto de la kapitalo, apud la amplekso de la komunaj produktadkondiĉoj, ekz-e konstruaĵoj, fornoj ktp, ĉefe ankaŭ kaj pli rapide ol la nombro da laboristoj, la krudmaterialo. Ties kvanto, konsumita en donita tempo per donita laborkvanto, kreskas en la sama proporcio kiel la produktadforto de la laboro pro ties divido. Kreskanta minimuma amplekso de kapitalo en la mano de la unuopa kapitalisto aŭ kreskanta transformado de la sociaj vivrimedoj kaj produktadrimedoj en kapitalon estas do leĝo fontanta el la teĥnika karaktero de la manufakturo.[80]

En la manufakturo, same kiel en la simpla kunlaborado, la kolektiva organismo de laboristoj estas ekzistformo de la kapitalo. La socia

80 „Ne sufiĉas, ke la kapitalo necesa por la subdivido de la metioj” (devus esti: la por tio necesaj viv- kaj produktad-rimedoj) „troviĝas en la socio; krome necesas, ke ĝi estu en la manoj de la entreprenistoj akumulita je sufiĉe konsiderindaj kvantoj por kapabligi ilin je grandskala laboro … Ju pli la divido kreskas, la konstanta uzado de sama kvanto da laboristoj postulas ĉiam pli konsiderindan kapitalon en instrumentoj, krudmaterialoj ktp.” (Storch: „Cours d'Économie Politique”, Pariza eldono, vol., 1, p. 250, 251) „La koncentriĝo de la produktadinstrumentoj kaj la labordivido estas same nedisigeblaj unu de la alia kiel surkampe de la politiko la centriĝo de la publikaj potencoj kaj la divido de la privatinteresoj.” (Karlo Markso: La mizero de la filozofio, l.c., p. 150)

produktadmeĥanismo, konsistanta el multaj individuaj partlaboristoj, apartenas al la kapitalisto. La produktadforto fontanta el la kombinado de la laboroj ŝajnas do esti produktadforto de la kapitalo. La vera manufakturo ne nur submetas la antaŭe sendependan laboriston al la komando kaj disciplino de la kapitalo, sed ĝi kreas krome hierarĥian strukturon inter la laboristoj mem. Dum la simpla kunlaborado ĝenerale lasas la labormanieron de la unuopuloj senŝanĝa, la manufakturo revolucias ĝin ĝisfunde kaj kaptas la individuan laborforton ĉe la radiko. Ĝi kripligas la laboriston al monstraĵo, per tio ke ĝi forceje subtenas lian detalan talenton per subpremado de mondo da produktivaj emoj kaj talentoj, same kiel oni en la La-Plato-ŝtatoj buĉas tutan beston por predi ties felon aŭ ties sebon. La apartaj partlaboroj estas ne nur dividitaj inter diversaj individuoj, sed la individuo mem estas dividita, transformita en la aŭtomatan radaron de partlaboro[81], kaj tie realiĝis la absurda fablo de Menenio Agripo, kiu prezentas homon kiel nuran fragmenton de sia propra korpo.[82] Dum la laboristo origine vendas sian laborforton al la kapitalo, ĉar la materiaj rimedoj por produktado de varo mankas al li, nun lia individua laborforto mem jam ne servas, se ĝi ne estas vendata al la kapitalo. Ĝi funkcias jam nur en kunteksto kiu ekzistas nur post ĝia vendo, en la laborejo de la kapitalisto.[83] Kiel al la elektita popolo estis skribite sur la frunto, ke ĝi estas la proprieto de Jehovo, tiel la labordivido premas al la manufaktura laboristo la stampon kiu faras lin proprieto de la kapitalo.

La konoj, la kompreno kaj la volo, kiun la sendependa terkulturisto aŭ metiisto, eĉ se malgrandskale, disvolvas, kiel la sovaĝulo praktikas ĉian militarton kiel personan ruzaĵon, estas bezonataj nun jam nur por la tutaĵo de la laborejo. La spiritaj povoj de la produktado grandigas sian skalon unuflanke, ĉar ili malaperas ĉe multaj flankoj. Kion la partlaboristoj perdas, tio koncentriĝas fronte al ili kiel kapitalo.[84] La manufaktura labordivido kontraŭmetas al ili la intelektajn povojn de la materia pro-

81 Dugald Stewart nomas la manufakturlaboristojn „vivaj aŭtomatoj …, uzataj por partlaboroj”. (l.c., p. 318)

82 Ĉe la koraloj ĉiu individuo funkcias efektive kiel stomako por la tuta grupo. Sed ĝi kondukas al ĝi nutraĵon, anstataŭ, kiel la roma patricio, forkonduki ĝin.

83 „La laboristo, kiu portas en siaj manoj tutan metion, povas iri ĉien por praktiki sian metion kaj trovi rimedojn por vivtenado; la alia (tiu de la manufakturoj) estas nur akcesoraĵo kiu, disigita de siaj kolegoj, jam havas nek kapablon nek sendependecon kaj kiu estas devigata akcepti la leĝon kiun oni volas trudi al li.” (Storch, l.c., eld. de Peterburgo, 1815, vol. 1, p. 204) -fr

84 A. Ferguson, l.c., p. 281: „Iu povas esti gajninta tion kion la alia perdis.”

duktadprocezo kiel fremdan proprieton kaj kiel potencon kiu dominas ilin. Tiu disiga procezo komenciĝas en la simpla kunlaborado, kie la kapitalisto reprezentas al la unuopaj laboristoj la unuecon kaj la volon de la socia kolektiva laboro. Ĝi evoluas en la manufakturo, kiu kripligas la laboriston al partlaboristo. Ĝi perfektiĝas en la granda industrio, kiu disigas la sciencon kiel sendependan produktadforton disde la laboro kaj premas ĝin en la servon de la kapitalo.[85]

En la manufakturo la riĉigo de la kolektiva laboristo, kaj sekve de la kapitalo, je sociaj produktadfortoj havas kiel kondiĉon la malriĉigon de la laboristo je individuaj produktadfortoj.

> „La nescio estas la patrino de la industrio kiel de la superstiĉo. Pripensado kaj imagpovo estas submetitaj al eraro; sed la kutimo movi la piedon aŭ la manon dependas nek de la unua nek de la alia. Manufakturoj prosperas do pleje, kie oni pleje rezignas pri intelekto, en la maniero ke la laborejo rigardeblas kiel maŝino, kies partoj estas homoj."[86]

Efektive kelkaj manufakturoj meze de la 18-a jarcento dungis por certaj simplaj operacioj, kiuj tamen estis fabrikaj sekretoj, prefere duonajn idiotojn.[87]

> „La spirito de la granda plimulto de la homoj", diras A. Smith, „evoluas nepre el kaj ĉe iliaj ĉiutagaj faroj. Homo, kiu elspezas sian tutan vivon per plenumado de malmultaj simplaj operacioj … ne havas okazon ekzerci sian intelekton … Li fariĝas ĝenerale tiom stulta kaj nescia, kiom eblas por homa kreitaĵo."

Post kiam Smith priskribis la spiritan inertecon de la partlaboristo, li daŭrigas:

> „La unuformeco de lia lokfiksita vivo kompreneble difektas ankaŭ la kuraĝon de lia spirito … Ĝi detruas eĉ la energion de lia korpo kaj malebligas al li uzi sian forton impete kaj daŭreme, escepte en la detala manipulado por kiu li estas formita. Lia talento en lia aparta metio ŝajnas tiel akirita surkoste de liaj intelektaj, sociaj kaj militaj virtoj. Sed en ĉiu industria kaj civilizita socio tiu estas la stato en kiun la laboranta malriĉulo (*the labouring poor*), t.e. la granda

85 „La homo de la scio kaj la produkta laboristo estas ege disigitaj, kaj la scienco, anstataŭ en la mano de la laboristo pliigi ties proprajn produktadfortojn por li mem, preskaŭ ĉie kontraŭmetis sin al li … Kono fariĝas instrumento, disigebla disde la laboro kaj kontraŭmetebla al ĝi." (W. Thompson: „An Inquiry into the Principles of the Distribution of Wealth", Londono, 1824, p. 274)

86 A. Ferguson, l.c., p. 280.

87 J. D. Tuckett: „A History of the Past and Present State of the Labouring Population", Londono, 1846, vol. 1, p. 148.

amaso de la popolo devas nepre fali.”[88]

Por malebligi la kompletan kripligon de la popolamaso, kiu rezultas el la labordivido, A. Smith rekomendas devigan ŝtatan popolinstruadon, kvankam en prudente homeopatiaj dozoj. Lia franca tradukisto kaj komentisto, G. Garnier, male polemikas kontraŭ tio, li kiu sub la unua franca imperio tute nature evoluis al senatoro. Instruado de la popolo, laŭ li, kontraŭdiras la unuan leĝon de labordivido, kaj kun tiu „oni proskribus nian tutan socian sistemon”.

> „Kiel ĉiuj aliaj labordividoj”, diras li, „tiu inter manlaboro kaj intelekta laboro[89] fariĝas pli klara kaj pli decida laŭ la mezuro en kiu la socio” (li uzas ĉi tie ĝuste tiun esprimon por la kapitalo, la grundproprieto kaj ilia ŝtato) „riĉiĝas. Same kiel ĉiu alia, tiu labordivido estas efiko de pasintaj kaj kaŭzo de estontaj progresoj … Ĉu la registaro rajtas kontraŭagi tiun labordividon kaj haltigi ĝian naturan iradon? Ĉu ĝi rajtas uzi parton de la ŝtata enspezo por la provo konfuzi kaj miksi du klasojn de laboro, kiu strebas al sia divido kaj disigo?”[90]

Certa intelekta kaj korpa kripliĝo estas nedisigebla de la ĝenerala labordivido en la socio. Sed ĉar la manufakturperiodo multe pli antaŭenigas tiun socian disfendadon de la laborbranĉoj, aliflanke nur per sia specifa divido kaptas la individuon ĉe ĝia vivradiko, ĝi liveras ankaŭ unue la materialon kaj la impulson por la industria patologio.[91]

---

88 A. Smith: „Wealth of Nations”, 1. vol., ĉap. 1, art. 11. Kiel disĉiplo de A. Ferguson, kiu estis priskribinta la malavantaĝajn sekvojn de la labordivido, A. Smith tute konsciiĝis pri tiu punkto. Komence de sia verko, en kiu li celebras la labordividon, li kontentiĝas indiki ĝin preterpase kiel fonton de sociaj malegalecoj. Nur en la 5-a libro pri la ŝtata enspezo, la lasta libro de sia verko, li reproduktas la ideojn de Ferguson. Mi diris en „La mizero de la filozofio” la plej necesan pri la historia rilato de Ferguson, A. Smith, Lemontey kaj Say en ilia kritiko de la labordivido kaj tie ankaŭ prezentis unue la manufakturan labordividon kiel specifan formon de la kapitalisma produktadmaniero. (Karlo Markso: La mizero de la filozofio, l.c., p. 142-148)

89 Ferguson diras jam, l.c. p. 281: „Kaj la pensado mem povas en tiu ĉi epoko de labordividoj fariĝi aparta metio.”

90 G. Garnier, vol. 5 de lia traduko, p. 4-5.

91 Ramazzini, profesoro pri praktika medicino en Padovo, publikigis en 1713 sian verkon „De morbis artificum”, tradukitan 1777 al la franca, represitan 1841 en la „Encyclopédie des Sciences Médicales, 7[me] Div. Auteurs Classiques”. La periodo de la granda industrio kompreneble tre ampleksigis lian katalogon de laboristaj malsanoj. Vidu interalie „Hygiène physique et morale de l'ouvrier dans les grandes villes en général, et dans la ville de Lyon en

„Subdividi homon signifas ekzekuti lin, se li meritas la mortkondamnon, murdi lin, se li ne meritas ĝin. La subdivido de la laboro estas la murdo de popolo."[92]

La kunlaborado bazita sur labordivido, aŭ la manufakturo, estas en siaj komencoj nature sponta afero. Ekde kiam ĝi akiris ian konsiston kaj sufiĉe larĝan bazon, ĝi fariĝas konscia, laŭplana kaj sistema formo de la kapitalisma produktadmaniero. La historio de la vera manufakturo montras, kiel la labordivido propra al ĝi akiras unue laŭsperte, kvazaŭ malantaŭ la dorso de la agantaj personoj, la plej avantaĝajn formojn, sed poste, same kiel la tradicia metio, strebas tradicie konservi la jam trovitan formon kaj en kelkaj kazoj konservas ĝin dum jarcentoj. Se tiu formo ŝanĝiĝas, tiam – escepte en flankaj kondiĉoj – ĉiam nur sekve al revolucio de la laborinstrumentoj. La moderna manufakturo – mi ne parolas ĉi tie pri la granda industrio kiu baziĝas sur maŝinaro – aŭ trovas, kiel ekz-e la vestaĵmanufakturo, en la grandaj urboj, kie ĝi estiĝas, la disajn membrojn[93] jam tute pretaj kaj bezonas nur kolekti ilin el ilia diseco, aŭ la principo de divido aplikeblas facile, simple per atribuado de certaj faroj de metia produktado (ekz-e ĉe librobindado) ekskluzive al apartaj laboristoj. Kostas eĉ ne semajnon da sperto por en tiaj kazoj trovi la proporcian nombron inter la necesaj laboristoj por la diversaj funkcioj.[94]

particulier [Korpa kaj morala higieno de la laboristo en la grandaj urboj ĝenerale kaj en la urbo Liono aparte]. Par le Dr. A. L. Fonteret, Parizo 1858, kaj [R. H. Rohatzsch] „Die Krankheiten, welche verschiedenen Ständen, Altern und Geschlechtern eigenthümlich sind [La malsanoj kiuj estas propraj al diversaj statoj, aĝoj kaj seksoj]", 6 volumoj, Ulmo, 1840. En la jaro 1854 la Society of Arts nomumis enketkomisionon pri industria patologio. La listo de dokumentoj kolektitaj de tiu komisiono troviĝas en la katalogo de la „Twickenham Economic Museum". Tre gravas la oficialaj raportoj pri publika sano („Reports on Public Health"). Vidu ankaŭ Eduard Reich, M.D., „Ueber den Ursprung der Entartung des Menschen [Pri la origino de la degenero de la homo]", Erlango, 1868.

92 „To subdivide a man is to execute him, if he deserves the sentence, to assassinate him, if he does not … the subdivision of labour is the assassination of a people." (D. Urquhart: „Familiar Words", Londono, 1855, p. 119. Hegelo havis tre herezajn opiniojn pri la labordivido. „Sub kleraj homoj oni povas unue kompreni tiujn kiuj kapablas fari ĉion kion faras aliaj", diras li en sia jurfilozofio.

93 En la originalo: „*die disjecta membra poetae* [la disaj membroj de la poeto]" -vl

94 La naiva kredo ke la individua kapitalisto apriore kaj genie inventas la labordividon, troveblas jam nur ĉe germanaj profesoroj, kiel s-ro Roscher ekz-e, kiu al la kapitalisto, el kies jupitera kapo elsaltas la preta labordivido, pro

La manufaktura labordivido kreas per analizo de la metia agado, specifado de la laborinstrumentoj, formado de la partlaboristoj, ilia grupado kaj kombinado en tutaĵan meĥanismon, la kvalitan strukturon kaj kvantan proporciecon de sociaj produktadprocezoj, do certan organizadon de socia laboro, kaj per tio samtempe disvolvas novan, socian produktadforton de la laboro. Kiel specife kapitalisma formo de la socia produktadprocezo – kaj sur la trovitaj bazoj ĝi povis evolui ne alie ol en la kapitalisma formo – ĝi estas nur aparta metodo produkti relativan plusvaloron, alivorte la memvalorigon de la kapitalo – kiun oni nomas socian riĉaĵon, *wealth of nations* ktp – surkoste de la laboristoj. Ĝi disvolvas la socian produktadforton de la labor ne nur por la kapitalisto anstataŭ por la laboristo, sed per la kripligo de la individua laboristo. Ĝi produktas novajn kondiĉojn de la regado de la kapitalo super la laboro. Se ĝi do unuflanke aperas kiel historia progreso kaj necesa evolumomento en la ekonomia formiĝado de la socio, ĝi aperas aliflanke kiel rimedo de civilizita kaj rafinita ekspluatado.

La politika ekonomio, kiu aperas kiel propra scienco nur en la manufakturperiodo, konsideras la socian labordividon entute nur el la vidpunkto de la manufaktura labordivido[95], kiel rimedon por produkti per la sama kvanto da laboro pli da varo, per tio malplikostigi la varojn kaj rapidigi la akumuladon de la kapitalo. En klara kontrasto al tiu emfazo de kvanto kaj interŝanĝvaloro, la verkistoj de la klasika antikveco konsideras ekskluzive kvaliton kaj uzvaloron.[96] Pro la disigo de la sociaj produktad-

danko dediĉas „diversajn laborsalajrojn". La pli aŭ malpli granda apliko de labordivido dependas de la longeco de la monujo, ne de la grando de la genio.

95 Pli ol A. Smith, antaŭaj verkintoj, kiel Petty, kiel la anonima aŭtoro de la „*Advantages of the East-India Trade*" ktp, difinas la kapitalisman karakteron de la manufaktura labordivido.

96 Escepto inter la modernaj estas kelkaj verkistoj de la 18-a jarcento, kiuj pri labordivido preskaŭ nur ripetas la antikvajn, ekz-e Beccaria kaj James Harris. Beccaria: „Al ĉiu lia propra sperto pruvas ke, se oni dediĉas manon kaj menson ĉiam al la sama speco de laboroj kaj produktoj, oni produktas tiujn pli facile, pli abunde kaj pli bone, ol se ĉiu produktus por si tion kion li bezonas … Tiel la homoj dividiĝas je la utilo de la socio kaj je sia propra avantaĝo en diversajn klasojn kaj statojn." (Cesare Beccaria: „*Elementi di Econ. Publica*", eld. Custodi, Part. Moderna, vol. 11, p. 28) James Harris, la posta Earl of Malmesbury, fama pro la „*Diaries*" pri sia legacio en Sankt-Peterburgo, diras mem en noto al sia „*Dialogue concerning Happiness*", Londono, 1741, poste represita en „*Three Treatises ktp*", 3-a eld. Londono, 1772: „La tuta pruvo de tio, ke la socio estas io natura (nome per la „divido de la okupiĝoj"), estas

branĉoj la varoj produktiĝas pli bone, la diversaj emoj kaj talentoj de la homoj elektas kongruajn agadsferojn[97], kaj sen limiĝo nenie fareblas io grava.[98] Do, produkto kaj produktanto pliboniĝas per labordivido. Se oni okaze mencias ankaŭ la kreskon de la produktokvanto, tiam nur koncerne la pli grandan amplekson de la uzvaloro. Oni dediĉas eĉ ne silabon al la interŝanĝvaloro, al la malplikostigo de la varoj. Tiu vidpunkto de la uzvaloro regas ĉe Platono[99], kiu pritraktas la labordividon kiel bazon de la socia divido de la statoj, kiel ankaŭ ĉe Ksenofono[100], kiu per sia tipa burĝa instinkto jam proksimiĝas al la labordivido ene de laborejo. La platona

elprenita el la dua libro de la „Respubliko” de Platono.”

97 Tiel en la Odiseado, XIV, 228: „Ĉar alia viro ĝuas ankaŭ aliajn laborojn” kaj Arĥiloĥo citita de Seksto Empiriko: „Ĉiu refreŝigas sian menson ĉe alia laboro.”

98 „Multajn laborojn li kapablis, sed ĉiujn li kapablis malbone.” („Poll' epistaio erga, kakos d'epistano panta”) – La atenano sentis sin kiel varproduktisto supera al la spartano, ĉar tiu en milito povis disponi ja pri homoj, sed ne pri mono, kiel Tucidido dirigas Periklon en la parolado, en kiu li instigas la atenanojn al la Peloponeza Milito: „Militi per siaj korpoj tiuj memsufiĉuloj [homoj kiuj produktas por sia propraj bezonoj] pretas pli ol per mono.” (Thuk. libro 1, ĉ. 141) Tamen ilia idealo restis, ankaŭ en la materia produktado, la *autarkeia* [memsufiĉo], kiu kontrastas kun la labordivido, „ĉar ĉe tiuj ĉi ekzistas prospero, sed ĉe tiuj ankaŭ la sendependeco”. Oni devas ĉe tio konsideri, ke ankoraŭ dum la tempo de la falo de la 30 tiranoj ne ekzistis 5.000 atenanoj sen grundproprieto.

99 Platono disvolvas la labordividon ene de la komunumo el la diverseco de la bezonoj kaj el la unuflankeco de la talentoj de la individuoj. Ĉefa vidpunkto ĉe li estas, ke la laboristo devas adaptiĝi al la laboraĵo, kaj ne la laboraĵo al la laboristo, kio lasta estas neevitebla, se li praktikas diversajn artojn samtempe, do unu aŭ alian kiel flankan okupiĝon. „Ĉar la laboro ne volas atendi la liberan tempon de tiu kiu faras ĝin, sed la laboristo devas teni sin ĉe la laboro, sed ne facilanime. – tio estas necesa. – El tio sekvas do, ke oni produktas pli da ĉio kaj pli bele kaj ankaŭ pli facile, se iu faras nur unu aferon, laŭ sia natura talento kaj ĝustatempe, libera de aliaj aferoj.” („*De Republica*”, II, 2. ec., Baiter, Orelli ktp) Simile ĉe Tucidido, l.c., ĉ. 142: „La maraj aferoj estas arto tiom kiom io ajn alia kaj ne praktikeblas ĉe eble okazantaj okazoj kiel flanka afero, sed pli ĝuste nenio alia apud ĝi kiel flankafero.” Se la laboraĵo, diras Platono, devas atendi la laboriston, tiam oni ofte maltrafas la krizan momenton de produktado kaj la laboraĵo fuŝiĝas, *„ergou kairon diollytai* [la ĝusta tempo por la laboro perdiĝas]” La sama platona ideo retroviĝas en la protesto de la anglaj blankigejposedantoj kontraŭ la klaŭzo de la fabrikleĝo, kiu fiksas certan manĝhoron por ĉiuj laboristoj. Ilia afero ne povas adaptiĝi al la laboristoj, ĉar „el la diversaj operacioj de varmigo, lavado, blankigo, kalandrado, premado kaj kolorigado, neniu interrompeblas en certa momento

Respubliko, en tio ke la labordivido estas priskribata kiel forma principo de la ŝtato, estas nur atena idealigo de la egipta kastosistemo, kiel Egiptio estis ankaŭ de aliaj liaj samtempuloj konsiderata kiel industria modellando, ekz-e de Isokrato[101], kaj eĉ ankoraŭ de la grekoj de la roma imperia epoko.[102]

Dum la propradira manufaktura periodo, do dum la periodo kiam la manufakturo restis la dominanta formo de la kapitalisma produktadmaniero, la plena realiĝo de ĝiaj tendencoj trafas sur multspecaj malhelpoj. Kvankam ĝi kreas, kiel ni vidis, apud la hierarĥia strukturo de la laboristoj simplan disigon inter lertaj kaj nelertaj laboristoj, la nombro de tiuj lastaj restas tre limigita pro la dominanta influo de la unuaj. Kvankam ĝi adaptas la apartajn operaciojn al la diversa grado de matureco, forto kaj

sen danĝero fuŝiĝi … La trudado de la sama manĝhoro por ĉiuj laboristoj povas okaze endanĝerigi valorajn havaĵojn per tio ke la laborprocezo ne estas finita.” Kie la platonismo ankoraŭ ennestiĝos!

100 Ksenofono rakontas, ke estas ne nur honore, ricevi manĝaĵojn el la tablo de la persa reĝo, sed ke tiuj manĝaĵoj estas ankaŭ multe pli bongustaj ol aliaj. „Kaj tio estas nenio mirinda, ĉar kiel la ceteraj artoj estas aparte perfektigitaj en la grandaj urboj, same la reĝaj manĝaĵoj estas preparataj tute aparte. Ĉar en la malgrandaj urboj, la sama homo faras liton, pordon, tablon; ofte li krome konstruas domojn kaj kontentas se li trovas mem tian klientaron sufiĉan por lia vivtenado. Estas tute malebla, ke homo, kiu faras tiom da diversaj aferoj, faras ĉion bone. Sed en la grandaj urboj, kie ĉiu individuo trovas multajn aĉetantojn, sufiĉas ankaŭ unu metio por nutri la homon. Ofte por tio eĉ ne necesas tuta metio, sed iu faras virajn ŝuojn, la alia inajn ŝuojn. Ie kaj tie iu vivas nur per kudrado, la alia per tranĉado de la ŝuoj; iu pritranĉas nur vestaĵojn, la alia nur kunmetas la pecojn. Necesas nun ke la faranto de la plej simpla laboro faru ĝin ankaŭ plej bone. Same statas pri la kuirarto.” (Xen., „*Cyrop.*”, libro VIII, ĉ. 2) Ĉi tie fiksiĝas ekskluzive la celata boneco de la uzvaloro, kvankam Ksenofono jam scias ke la skalo de la labordivido dependas de la amplekso de la merkato.

101 „*Li* (Busiris) dividis ĉiujn en apartajn kastojn … ordonis, ke ĉiam la samaj faru la samajn aferojn, ĉar li sciis, ke tiuj, kiuj ŝanĝas siajn okupiĝojn, fariĝas solidaj en neniu okupiĝo; sed ke tiuj, kiuj restas konstante ĉe la samaj okupiĝoj, plenumas tiujn plej perfekte. Vere ni trovos ankaŭ, ke ili koncerne artojn kaj metiojn superis siajn konkurantojn pli ol alie la majstro la fuŝulon. Kaj koncerne la institucion, per kiu ili konservas la reĝan povon kaj la ceteran ŝtatan konstitucion, ili estas tiom elstaraj, ke la plej famaj filozofoj, kiuj entreprenas paroli pri tio, laŭdas la ŝtatan konstitucion de Egiptio antaŭ aliaj.” (Isokrato: „Busiris”, ĉ. 8)

102 Kp Diodorus Siculus [Diodoro de Sicilio].

evoluo de siaj vivantaj labororganoj kaj pro tio kondukas al produktiva ekspluatado de virinoj kaj infanoj, tiu tendenco fiaskas ĝenerale pro la kutimoj kaj la rezistado de la viraj laboristoj. Kvankam la malkomponado de la metia agado reduktas la kostojn de formado kaj pro tio la valoron de la laboristoj, por la pli malfacila detallaboro daŭre necesas pli longa lerntempo, kiu estas eĉ tie, kie ĝi estas superflua, ĵaluze konservata de la laboristoj. Ni trovas ekz-e en Anglio la leĝojn pri metilernantoj (*laws of apprenticeship*) kun la sepjara lerntempo ĝis fine de la manufakturperiodo en plena valideco kaj renversitaj nur de la granda industrio. Ĉar la metia lerteco restas la bazo de la manufakturo kaj ĉar la tuta meĥanismo funkcianta en ĝi ne posedas objektivan skeleton sendependan de la laboristoj mem, la kapitalo baraktas konstante kun la malobeemo de la laboristoj.

> „La malforteco de la homa naturo", elkrias amiko Ure, „estas tiom granda, ke la laboristo, ju pli li estas lerta, des pli li fariĝas obstina kaj malfacile traktebla, kaj sekve li kaŭzas al la tuta meĥanismo per siaj kapricoj gravan malutilon."[103]

Pro tio, tra la tuta manufaktura periodo iras la plendo pri la manko de disciplino de la laboristoj.[104] Kaj se ni ne havus la atestojn de samtempaj verkistoj, la simplaj faktoj, ke la kapitalo de la 16-a jarcento ĝis la epoko de la granda industrio malsukcesas mastri la tutan disponeblan labortempon de la manufakturaj laboristoj, ke la manufakturoj havas mallongan vivon kaj kun la en- aŭ el-migrado de la laboristoj forlasas sian sidejon en iu lando kaj restarigas ĝin en la alia, tiuj faktoj mem parolus kiel tutaj bibliotekoj. „Iel aŭ alie necesas fari ordon", elkrias 1770 la ripete citita aŭtoro de la „*Essay on Trade and Commerce*". Ordo, tiel resonas 66 jarojn poste el la buŝo de la d-ro Andrew Ure, „ordo" mankas en la manufakturo bazita sur „la skolastika dogmo de laboro", kaj „Arkwright kreis la ordon".

Aldonendas ke la manufakturo povis nek akapari la socian produktadon en ĝia tuta amplekso nek profunde transformi ĝin. Kiel verko de ekonomia arto, ĝi leviĝis sur la larĝa bazo de la urba metio kaj de la kampara hejmindustrio. Ĝia propra mallarĝa teĥnika bazo, ĉe certa evolugrado, konfliktiĝis kun la produktadbezonoj kiujn ĝi estis mem kreintaj.

Unu el ĝiaj plej perfektaj kreitaĵoj estis la laborejo por produktado de la laboriloj mem, kaj ĉefe ankaŭ de la jam aplikataj komplikaj meĥanikaj aparatoj.

---

103 Ure, l.c., p. 20.

104 La dirito en la teksto validas multe pli pri Anglio ol pri Francio kaj pli pri Francio ol pri Nederlando.

Tia maŝinlaborejo, diras Ure,

> „prezentis la labordividon en multaj gradoj: fajlilo, borilo, tornilo, ĉiu havis sian propran laboriston, kun hierarĥia strukturo laŭ la grado de ilia lerteco.”[105]

Tiu produkto de la manufaktura labordivido produktis siavice – maŝinojn. Ili forigas la metian agadon kiel reguligan principon de la socia produktado. Tiel unuflanke foriĝas la teĥnika kialo de la vivolonga aneksado de la laboristo al parta funkcio. Aliflanke falas la baroj, kiujn la sama principo ankoraŭ trudis al la dominado de la kapitalo.

105l.c., p. 21.

# DEKTRIA ĈAPITRO: Maŝinaro kaj granda industrio

## 1. Disvolvado de la maŝinaro

John Stuart Mill diras en siaj „Principoj de la politika ekonomio”:

> „Estas dubinde ĉu la tutaj ĝis nun faritaj meĥanikaj inventoj faciligis la ĉiutagajn klopodojn de iu ajn homa estulo.”[106]

Sed tio ja tute ne estas la celo de la kapitalisme aplikata maŝinaro. Same kiel ĉiu alia disvolvado de la produktadforto, ĝi devas igi la varojn malpli kostaj kaj mallongigi la labortagon kiun la laboristo bezonas por si mem, por longigi la alian parton de lia labortago, kiun li donas senpage al la kapitalisto. Ĝi estas rimedo por produktado de plusvaloro.

La revolucio de la produktadmaniero havas en la manufakturo kiel elirpunkton la laborforton, en la granda industrio la laborrimedon. Necesas do unue esplori, per kio la laborrimedo estis transformata el ilo al maŝino, aŭ per kio la maŝino distingiĝas de metia ilo. Temas ĉi tie nur pri grandaj, ĝeneralaj karakterizaj trajtoj, ĉar abstrakte striktaj limlinioj disigas la epokojn de la socia historio ne pli ol tiujn de la Ter-historio.

Matematikistoj kaj meĥanikistoj – kaj anglaj ekonomikistoj ie kaj tie ripetas tion – deklaras la ilon simpla maŝino kaj la maŝinon kunmetita ilo. Ili ne vidas en tio esencan diferencon kaj nomas maŝino eĉ la simplajn meĥanikajn povojn, kiel levilon, klinebenon, ŝraŭbon, kejlon ktp.[107] Ĉiu maŝino efektive konsistas el tiuj simplaj povoj, ĉiam maskitaj kaj kombinitaj. Sed el ekonomia vidpunkto la klarigo ne taŭgas, ĉar mankas al ĝi la historia elemento. Aliflanke oni serĉas la diferencon inter ilo kaj maŝino en tio, ke ĉe la ilo la movforto estas la homo, ĉe la maŝino naturforto alia ol homa, ekz-e besto, akvo, vento ktp.[108] Laŭ tio, plugilo tirata de bovo, kiu apartenas al la plej diversaj epokoj de produktado, estus

---

106 „It is questionable, if all the mechanical inventions yet made have lightened ghe day's toil of any human being.” Mill devintus aldoni „de iu ajn homa estulo, kiu ne vivas de la laboro de aliuloj”, ĉar la maŝinaro senkonteste tre pliigis la nombron de la elegantaj nenifaruloj.

107 Vd ekz-e Hutton: „Course of Mathematics”.

108 „El tiu vidpunkto eblas ankaŭ fari striktan limon inter ilo kaj maŝino: fosilo, martelo, ĉizilo ktp, levilaj kaj ŝraŭbaj instrumentoj, por kiuj, kiom ajn komplikaj ili cetere povas esti, la homo estas la mova forto … ĉio ĉi falas sub la nocion de ilo; dum la plugilo kun la ĝin movanta bestforto, vent- kaj akvomueliloj ktp klasendas al la maŝinoj.” (Wilhelm Schulz: *„Die Bewegung der Produktion”*, Zuriko, 1843, p. 38) Tiu verko meritas plurrilate laŭdojn.

maŝino, kaj la rondteksilo de Claussen[109] kiu, movata de la mano de unu sola laboristo, produktas 96.000 maŝojn en la minuto, estus simpla ilo. Eĉ la sama rondteksilo estus ilo, se movata mane, kaj maŝino, se movata per vaporo. Ĉar la aplikado de bestforto estas unu el la plej malnovaj inventoj de la homaro, la maŝina produktado estus efektive pli malnova ol la metia produktado. Kiam John Wyatt en la jaro 1735 anoncis sian ŝpinmaŝinon kaj kun tiu la industrian revolucion de la 18-a jarcento, li tute ne indikis, ke la maŝino estu movata de azeno anstataŭ de homo, kaj tamen tiun rolon transprenis la azeno. Maŝino *„por ŝpini sen fingroj"* estis lia programo.[110]

Ĉia disvolvita maŝinaro konsistas el tri esence malsamaj partoj, la movmaŝino, la transmisia meĥanismo, fine la ilmaŝino aŭ labormaŝino. La movmaŝino efikas kiel movforto de la tuta meĥanismo. Ĝi kreas sian propran movforton, ekz-e la vapormaŝino, varmaera maŝino, elektromagneta maŝino ktp, aŭ ĝi ricevas la impulson de jam preta naturforto ekster ĝi, ekz-e la akvorado de la diferenco de akvonivelo, la ventalo de la vento ktp. La transmisia meĥanismo, konsistanta el inerciradoj, aksoj, dentradoj, spiralradoj, ŝnuroj, rimenoj, interaj reguligiloj kaj plej diversaj aranĝoj, reguligas la movadon, transformas, kie necesas, ĝian formon, ekz-e el orta en cirklan, disdonas kaj transdonas ĝin al la ilaj maŝinoj. Ambaŭ partoj de la meĥanismo ekzistas nur por doni al la ilmaŝino la movon, per kiu ĝi kaptas kaj laŭcele ŝanĝas la laborobjekton. Estas tiu parto de la maŝinaro,

---

109 Angle: *circular loom.*

110 Jam antaŭ li oni uzis maŝinojn por antaŭŝpinado, kvankam nur tre malperfektajn, verŝajne unue en Italio. Kritika historio de teĥnologio entute pruvus, kiom malmulte invento de la 18-a jarcento apartenas al unu sola individuo. Ĝis nun ne ekzistas tia verko. Darvino direktis la intereson al la historio de la natura teĥnologio, do sur la formiĝo de la plantaj kaj bestaj organoj kiel produktadinstrumentoj por la vivo de la plantoj kaj animaloj. Ĉu la historio de la formiĝo de la produktad-organoj de la socia homo, de la materia bazo de ĉia aparta socia organizo, ne meritas saman atenton? Kaj ĉu ĝi ne livereblas pli facile, ĉar, kiel Vico diras, la homhistorio distingiĝas disde la naturhistorio per tio ke ni faris tiun kaj ne faris la alian? La teĥnologio malkaŝas la aktivan konduton de la homo al la naturo, la rektan produktadprocezon de lia vivo, per tio ankaŭ de liaj sociaj vivkondiĉoj kaj de la intelektaj ideoj kiuj fontas el ili. Eĉ ĉia religia historio, kiu abstraktas tiun materian bazon, estas – nekritika. Efektive estas multe pli facile trovi per analizo la teran kernon de la religiaj nubaj konceptoj ol inverse disvolvi el la respektivaj realaj vivkondiĉoj ties ĉieligitajn formojn. La lasta estas la sole materiisma kaj do scienca metodo. La mankoj de la abstrakte naturscienca materiismo, kiu ekskludas la historian procezon, videblas jam ĉe la abstraktaj kaj ideologiaj ideoj de iliaj porparolantoj, ekde kiam ili kuraĝas iri trans sia specialaĵo.

la ilmaŝino, de kiu eliras la industria revolucio en la 18-a jarcento. Ĝi fariĝas ankoraŭ nun ĉiutage denove la elirpunkto, ĉiam kiam metia aŭ manufaktura reĝimo transiras en maŝinan reĝimon.

Se ni nun rigardas iom pli detale la ilmaŝinon aŭ la veran labormaŝinon, tiam ĝenerale, kvankam ankaŭ ofte en tre modifita formo, la aparatoj kaj iloj reaperas, per kiuj la metiisto kaj manufakturlaboristo laboras, sed anstataŭ kiel iloj de la homo nun kiel iloj de meĥanismo aŭ kiel meĥanikaj iloj. Aŭ la tuta maŝino estas nur pli aŭ malpli ŝanĝita meĥanika variaĵo de la malnova metia ilo, ekzemple ĉe la meĥanika teksilo[111], aŭ la agantaj organoj, almetitaj al la kadro de la labormaŝino, estas malnovaj konatoj, ekz-e ŝpiniloj[112] ĉe la ŝpinmaŝino, trikiloj ĉe la ŝtrumptrikmaŝino, segilklingo ĉe la segmaŝino, tranĉiloj ĉe la dispecigmaŝino ktp. La diferenco de tiuj iloj disde la propradira korpo de la labormaŝino ekzistas jam ekde ilia naskiĝo. Ili estas ja daŭre fabrikataj plejparte metie aŭ manufakture kaj nur poste fiksataj al la maŝinmaniere produktita korpo de la labormaŝino.[113] La ilmaŝino estas do meĥanismo, kiu per transdono de la ĝusta movo plenumas per siaj iloj la samajn operaciojn, kiujn antaŭe la laboristo faris per similaj iloj. Ĉu la movforto devenas de homo aŭ siavice mem de maŝino, tio ne gravas tiurilate. Post transigo de la propradira ilo de la homo al meĥanismo, maŝino anstataŭas la nuran ilon. La diferenco tuj okulfrapas, eĉ se la homo restas ankoraŭ la unua movanto. La nombro da laboriloj, per kiuj li povas samtempe agi, estas limigita per la nombro da liaj naturaj produktadinstrumentoj, de liaj korpaj organoj. Oni provis en Germanio unue igi ŝpiniston movi du ŝpinradojn, do laborigi lin samtempe per du piedoj kaj du manoj. Tio estis tro peniga. Poste oni inventis ŝpinradon kun du ŝpiniloj, sed la ŝpin-virtuozuloj, kiuj kapablis ŝpini du fadenojn samtempe, estis preskaŭ same maloftaj kiel dukapaj homoj. La *Jenny*, male, ŝpinas dekomence per 12 ĝis 18 ŝpiniloj, la ŝtrumptrikmaŝino trikas per plurmil trikiloj samtempe ktp. La nombro da iloj, per kiuj la sama ilmaŝino ludas samtempe, estas dekomence emancipita el la organika baro, per kiu la ilo de laboristo estas limigita.

Ĉe multaj metiaj iloj ilia strukturo mem sense vidigas la diferencon

111 Nome en la origina formo de la meĥanika teksilo oni unuavide rekonas la malnovan teksilon. En sia moderna formo ĝi aperas esence ŝanĝita.

112 Ankaŭ nomataj spindeloj. -vl

113 Nur de proksimume 1850 ĉiam kreskanta parto de la iloj de la labormaŝinoj estas en Anglio fabrikita maŝinece, kvankam ne de la sama fabrikistoj kiuj produktas la maŝinojn mem. Maŝinoj por fabriki tiajn meĥanikajn ilojn estas ekz-e la *automatic bobbin-making engine*, *card-setting engine*, maŝinoj por fari varporingojn, maŝinoj por forĝado de ŝpiniloj *mule* kaj *throstle*.

inter la homo kiel nura movforto kaj kiel laboristo plenumanta la propradiran agon. Ekz-e ĉe la ŝpinrado la piedo rolas kiel movforto, dum la mano, kiu laboras ĉe la ŝpinilo, tirante kaj turnante, faras la propradiran ŝpinadon. Ĝuste tiun lastan parton de la metia instrumento la industria revolucio kaptas unue kaj lasas al la homo, apud la nova laboro kontroli per siaj okuloj la maŝinon kaj korekti permane ties erarojn, unue ankoraŭ la pure meĥanikan rolon de movforto.

Sed iloj, ĉe kiuj dekomence la homo efikas nur kiel simpla movforto, ekz-e ĉe turnado de kranko de muelilo[114], ĉe pumpado, ĉe la movado supren kaj malsupren de balgoblovilo, ĉe puŝado de pistilo en pistujo ktp, instigas unue al uzado de bestoj, akvo kaj vento kiel movforto.[115] Ili evoluas al maŝinoj, parte ene de, sporade jam longe antaŭ la manufaktura periodo, sed ili ne revolucias la produktadmanieron. Ke ili estas jam maŝinoj eĉ en sia metia formo, tio montriĝas en la periodo de la granda industrio.

La pumpiloj ekz-e, per kiuj la holandanoj 1836 kaj 1837 elpumpis la lagon de Harlemo, estis konstruitaj laŭ la principo de ordinaraj pumpiloj, sed kolosaj vapormaŝinoj anstataŭ hommanoj movis iliajn piŝtojn. La ordinara kaj tre malperfekta balgoblovilo de la forĝisto estas ie kaj tie en Anglio nur per ligo de ĝiaj brakoj al vapormaŝino transformita al meĥanika aerpumpilo. La vapormaŝino mem, tia kia ĝi ekzistis dum la manufaktura periodo post sia invento fine de la 17-a jarcento kaj plu ekzistis ĝis komence de la 1880-aj jaroj[116], ne kaŭzis industrian revolucion. Male, la kreado de ilmaŝinoj bezonis la revoluciigitan vapormaŝinon. Ekde kiam la homo, anstataŭ agi per ilo sur la laborobjekton, funkcias jam nur kiel

114 Moseo de Egiptio diras: „Ne ligu la buŝon de la draŝanta bovo.” La kristanaj ĝermanaj homamantoj siavice metis al la servutulo, kiun ili uzis kiel movforton por mueli, iom grandan lignan diskon ĉirkaŭ la kolon, por ke li ne povu albuŝigi farunon.

115 Parte manko de sufiĉa akvo-dekliveco, parte batalo kontraŭ cetera troabundo de akvo, devigis la holandanojn uzi la venton kiel movforton. La ventmuelilon mem ili ricevis el Germanio, kie tiu invento kaŭzis belan batalon inter nobelaro, pastraro kaj imperiestroj pri la demando, al kiu la vento „apartenas”. Vento proprigas, tiel oni diris en Germanio, dum Holandon la vento liberigas. Tie ĝi liberigis ne la holandanon, sed la grundon por la holandano. Ankoraŭ en 1836 oni uzis en Holando 12.000 ventmuelilojn de 6.000 ĉevalpovoj, por protekti du trionojn de la lando kontraŭ remarĉiĝo.

116 Kvankam ĝi estis jam tre plibonigita de Watt, en la formo de vapormaŝino kiun oni nomis *simple efika,* en tiu formo ĝi restis simple levmaŝino por akvo kaj salakvo.

movforto sur ilmaŝino, la movado per homaj muskoloj fariĝas hazarda kaj akvo, vento, vaporo povas anstataŭi ĝin. Estas klare ke tia ŝanĝo postulas ofte grandajn teĥnikajn ŝanĝojn de la meĥanismo origine konstruita nur por homa movforto. Nuntempe oni konstruas ĉiujn maŝinojn, kiuj devas unue trabati al si la vojon, ekz-e kudromaŝinoj, panfarmaŝinoj ktp, se ili ne dekomence ekskludas la malgrandan skalon, samtempe por homa kaj pure meĥanika movforto.

La maŝino, kiel elirpunkto de la industria revolucio, anstataŭas do la laboriston kiu uzas unuopan ilon, per meĥanismo, kiu agas per granda amaso de la samaj aŭ samspecaj iloj samtempe kaj estas movata de unu sola movforto de ia ajn formo.[117] Jen la maŝino, sed nur kiel simpla elemento de la produktado per maŝinoj.

La pligrandigo de la amplekso de la labormaŝino kaj de la nombro da samtempe agantaj iloj postulas pli ampleksan movmeĥanismon, kaj tiu meĥanismo, por superi sian propran reziston, bezonas pli potencan movforton ol al homan, sendepende de tio, ke la homo estas tre malperfekta produktadinstrumento de samforma kaj kontinua movado. Ekde kiam la ilo estas anstataŭigita de maŝino movata de la homo, baldaŭ necesis anstataŭigi la homon en la rolo de movanto per aliaj naturfortoj.

El ĉiaj movfortoj kiujn la manufaktura periodo heredigis, la ĉevalo estis la plej malbona; parte ĉar ĉevalo havas, kiel oni diras, sian propran kapon, parte pro ĝiaj altaj kostoj kaj pro ĝia limigita uzebleco nur en fabrikoj.[118]

117 „La kunigo de tiuj simplaj instrumentoj, movataj de unu sola motoro, konsistigas maŝinon.” (Babbage, l.c., [p. 136].

118 John C. Morton antaŭlegis en la *Society of Arts*, en januaro 1861, eseon pri „la fortoj uzataj en kampkulturo”. En ĝi legeblas i.a.: „Ĉia plibonigo, kiu altigas la samformecon de la grundo, igas la vapormaŝinon pli aplikebla por produktado de pure meĥanika forto … ĉevalpovo estas necesa tie, kie malrektaj heĝoj kaj aliaj malhelpoj malebligas samforman agon. Tiuj malhelpoj foriĝas ĉiutage pli kaj pli. En operacioj, kiuj postulas pli da uzado de volo kaj malpli da vera forto, sole aplikeblas la forto ĉiuminute gvidata de la homa spirito, do homforto.” S-ro Morton poste reduktas vaporforton, ĉevalforton kaj homforton al la mezurunuo kutime uzata ĉe vapormaŝinoj, nome al la forto levi 33.000 funtojn minute je unu piedo, kaj kalkulas la kostojn de ĉevalpovo de la vapormaŝino je 3 pencoj kaj de la ĉevalo je $5^1/_2$ pencoj hore. Krome, la ĉevalo, se oni volas plene konservi ĝian sanon, aplikeblas nur 8 horojn tage. Per vaporpovo minimume 3 el 7 ĉevaloj sur kulturata grundo ŝpareblas dum la tuta jaro, kaj ĝiaj kostoj ne estas pli grandaj ol tiuj de la ŝparitaj ĉevaloj dum la tri aŭ kvar monatoj dum kiuj ili efektive laboras. En tiuj kampkulturaj operacioj, en kiuj la vaporforto aplikeblas, ĝi ankaŭ plibonigas, kompare kun

Tamen la ĉevalo estis ofte aplikata dum la infaneco de la granda industrio, pri kio atestas, apud la lamentadoj de la tiutempaj kampkulturistoj, la esprimo de la meĥanika forto, valida ĝis hodiaŭ, en ĉevalpovo.

Vento estis tro malkonstanta kaj nekontrolebla, kaj la uzo de akvoforto krome jam superis ĝin en Anglio, la naskiĝlando de la granda industrio, jam dum la manufakturperiodo. Jam en la 17-a jarcento oni provis movi du muelŝtonojn per unu akvorado. Sed nun la pli granda transmisi-meĥanismo konfliktiĝis kun la nun nesufiĉa akvoforto, kaj tio estas unu el la cirkonstancoj kiuj instigis al pli preciza esplorado de la leĝoj de frotado. Same la malsamforma movforto ĉe mueliloj, kiuj estis movataj per puŝado aŭ tirado, kondukis al teorio kaj aplikado de la inercirado[119], kiu ludas poste tiom grandan rolon en la granda industrio. Tiel la manufakturperiodo disvolvis la unuajn sciencajn kaj teĥnikajn elementojn de la granda industrio. La ŝpinmaŝino de Arkwright estis dekomence movata de akvo. Tamen ankaŭ la uzado de akvoforto kiel dominanta movforto estis ligita kun malfacilaĵoj. Ĝi ne estis laŭbezone pliigebla, kaj ĝia manko ne riparebla, de tempo al tempo ĝi ĉesis funkcii, kaj precipe, ĝi estis tute loka.[120] Nur per la dua vapormaŝino de Watt, la tiel nomata duoble efika, kiu produktas sian movforton mem el konsumado de karbo kaj akvo, kies fortogrado estas tute sub homa kontrolo, kaj estas movkapabla kaj movrimedo, urba kaj ne kampara kiel la akvorado, ebligas la koncentradon de la produktado en urboj, anstataŭ kiel la akvorado esti dissemita tra la lando,[121] estas universala en sia teĥnologia apliko, kaj la elekto de ĝia loko dependas relative malmulte de lokaj cirkonstancoj. La granda genio de

la ĉevalforto, la kvaliton de la faraĵo. Por fari la laboron de la vapormaŝino, oni devus apliki 66 laboristojn hore por kune 15 ŝilingoj, kaj por tiun de la ĉevaloj, 32 laboristoj por kune 8 ŝilingoj hore.

119 Faulhaber, 1625; De Cous, 1688.

120 La moderna invento de turbinoj liberigas la industrian ekspluatadon de la akvoforto el multaj antaŭaj limoj.

121 „En la frua tempo de la teksaĵ-manufakturo la loko de la fabriko dependis de la ekzistado de akvofluo kun sufiĉe da deklivo por turni akvoradon; kaj kvankam nun la starigo de akvomueliloj estis la unua bato por la hejma industrio, la mueliloj, kiuj nepre situis ĉe riveroj kaj ofte en konsiderinda distanco unu de la alia, estis parto pli de kampara ol de urba sistemo. Nur per la enkonduko de vaporforto kiel anstataŭanto de rivero la fabrikoj estis kunpremitaj en urboj kaj lokoj kie karbo kaj akvo, necesaj por produktado de vaporo, troviĝis en sufiĉa kvanto. La vapormaŝino estas la patrino de la industriaj urboj." (A. Redgrave en „*Reports of the Insp. of Fact., 30th April* 1860", p. 36)

Watt montriĝas en la specifado de la patento, kiun li prenis en aprilo 1784, kaj en kiu li priskribas sian vapormaŝinon ne kiel inventon por apartaj celoj, sed kiel ĝeneralan aganton de la granda industrio. Li aludas ĉi tie aplikojn, el kiuj kelkaj, ekz-e la vapormartelo, enkondukiĝis nur duonjarcenton poste. Sed li pridubis la aplikeblon de la vapormaŝino por marŝipoj. Liaj posteuloj, Boulton kaj Watt, ekspoziciis en la jaro 1851 ĉe la londona industri-ekspozicio la plej kolosan vapormaŝinon por oceanaj vaporŝipoj.

Post kiam unue la iloj estis transformitaj el iloj de la homa organismo en ilojn de meĥanika aparato, la ilmaŝino, nun ankaŭ la movmaŝino, ricevis memstaran formon komplete emancipitan el la limoj de homa forto. Per tio la unuopa ilmaŝino, kiun ni konsideris ĝis nun, reduktiĝas al la rango de simpla elemento de la maŝina produktado. Unu movmaŝino povis nun movi multajn labormaŝinojn samtempe. Kun la nombro da samtempe movataj labormaŝinoj la movmaŝino kreskas kaj la transmisia meĥanismo etendiĝas al kompleksa aparato.

Du aferoj nun distingendas: kunlaborado de multaj samspecaj maŝinoj kaj maŝinsistemo.

En la unua kazo la tuta laboro estas farata de la sama labormaŝino. Ĝi plenumas ĉiujn diversajn operaciojn, kiujn metiisto per sia ilo, ekz-e la teksisto per sia teksilo, plenumis aŭ kiujn metiistoj laŭvice plenumis per diversaj iloj, ĉu memstare aŭ kiel membroj de manufakturo.[122] Ekzemple en la moderna manufakturo de leterkuvertoj laboristo faldis la paperon per la faldilo, alia surmetis glugumon, tria turnis la klapon kie estis premota la leterkapo, alia surpremis tiun, kaj tiel plu, kaj ĉe ĉiu tia parta operacio ĉiu unuopa kuverto devis iri al alia mano. Unu sola kuvertmaŝino plenumas ĉiujn ĉi operaciojn unufrape kaj faras 3.000 kaj pli da kuvertoj en horo. Usona maŝino por farado de papersaketoj, eksponita en la londona industri-ekspozicio de 1862, tranĉas la paperon, metas gluilon, faldas kaj finfaras 300 pecojn minute. La tuta procezo dividita en la manufakturo kaj plenumata laŭvice, estas ĉi tie plenumta de

122 El la vidpunkto de la manufaktura labordivido, teksado estis ne simpla, sed male komplika metia laboro, kaj do la meĥanika teksilo estas maŝino, kiu faras tre diversajn operaciojn. Entute estas eraro kredi, ke la moderna maŝino akaparis origine tiajn operaciojn, kiujn la manufaktura labordivido estis simpliginta. Ŝpinado kaj teksado estis dum la manufakturperiodo disigitaj en novajn laborspecojn kaj iliaj iloj plibonigitaj kaj variigitaj, sed la laborprocezo mem, tute ne dividita, restis metia. Ne estas la laboro, sed la laborrimedo, kiu estas la elirpunkto de la maŝino.

labormaŝino, kiu agas per kombinado de diversaj iloj. Egale ĉu tia labormaŝino estas nur meĥanika renaskiĝo de pli komplika metia ilo aŭ kombiniĝo de diversspecaj, manufakturece apartigitaj simplaj iloj – en la fabriko, tio signifas, en la laborejo bazita sur maŝinsistemo, ĉiufoje reaperas la simpla kunlaborado, kaj tio unue (se ni por momento lasas la laboriston ekster konsidero) kiel spaca konglomeraĵo de samspecaj kaj samtempe kunagantaj labormaŝinoj. Tiel teksfabriko estiĝas per la apudeco de multaj meĥanikaj teksiloj kaj kudrofabriko per la apudeco de multaj kudromaŝinoj en la sama laborejo. Sed ĉi tie ekzistas teĥnika unueco, per tio ke la multaj samspecaj labormaŝinoj ricevas samtempe kaj samtakte sian impulson el la korbatado de la komuna unua motoro, transigata al ili per la transmisi-meĥanismo, kiu estas ankaŭ parte komuna al ili, kaj de kiu nur apartaj rimenoj disbranĉiĝas por ĉiu unuopa ilmaŝino. Same kiel multaj iloj konsistigas la organojn de labormaŝino, nun multaj labormaŝinoj konsistigas nun jam nur samspecajn organojn de la sama movmeĥanismo.

Sed propradira maŝinsistemo anstataŭas la unuopan memstaran maŝinon nur tie, kie la laborobjekto trairas serion da kunteniĝaj diversaj ŝtupaj procezoj, plenumataj de ĉeno de diversspecaj, sed reciproke sin kompletigantaj ilmaŝinoj. Ĉi tie reaperas la kunlaborado per labordivido, propra al la manufakturo, sed nun kiel kombiniĝo de partaj labormaŝinoj. La specifaj iloj de la diversaj partlaboristoj, en la la manufakturo ekzemple la lanbatisto, lankombisto, lantondisto, lanŝpinisto ktp, transformiĝas nun en la ilojn de specifaj labormaŝinoj, el kiuj ĉiu formas apartan organon por aparta funkcio en la sistemo de la kombinita ilmaŝinaro. La manufakturo mem liveras al la maŝinsistemo, en la branĉoj en kiuj ĝi estis unue enkondukita, ĝenerale la naturan bazon de la labordivido kaj pro tio la organizadon de la produktadprocezo.[123] Tamen tuj aperas esenca

123 Antaŭ la epoko de la granda industrio la lanmanufakturo estis la dominanta manufakturo de Anglio. Pro tio oni faris dum la unua duono de la 18-a jarcento en ĝi la plej multajn eksperimentojn. La kotono, kies meĥanika prilaborado postulas malpli penigajn preparojn, gajnis la spertojn faritajn pri ŝaflano, kiel poste inverse la meĥanika lanindustrio evoluis surbaze de la meĥanika koton-ŝpinado kaj -teksado. Kelkaj elementoj de la lanmanufakturo estis enkorpigitaj en la fabriksistemon nur en la lastaj jardekoj, ekz-e la lankombado. „La aplikado de meĥanika forto al la procezo de lankombado …, kiu okazas grandskale ekde la enkonduko de la kombmaŝino, speciale de tiu de Lister …, havis sendube la efikon ke granda nombro da laboristoj estis elĵetita el la laboro. Lano estis kombata unue mane, plej ofte en la kabano de la kombisto. Nun ĝi estas kombata ĝenerale en la fabriko, kaj manlaboro estas

diferenco. En la manufakturo la laboristoj devas, unuope aŭ grupe, plenumi ĉiun apartan partprocezon per sia ilo. Sed se la laboristo estas alproprigita al la procezo, tiam antaŭe ankaŭ la procezo estas adaptita al la laboristo. Tiu subjektiva principo de labordivido forfalas por la maŝineca produktado. La tuta procezo estas ĉi tie konsiderata objektive, en si mem, do analizita en siaj konsistigaj fazoj, kaj la problemo plenumi ĉiun partprocezon kaj ligi la diversajn partprocezojn estas solvita per teĥnika aplikado de meĥaniko, ĥemio ktp.[124] Kaj kompreneble ĉe tio necesas daŭre perfektigi la teorian koncepton per la amasigita praktika sperto de granda skalo. Ĉiu partmaŝino liveras al la sekvanta ties krudmaterialon, kaj ĉar ili ĉiuj agas samtempe, la produkto troviĝas same konstante sur la diversaj ŝtupoj de sia estiĝprocezo, kiel en la transiro de unu produkta fazo en la alian. Kiel en la manufakturo la rekta kunlaborado de la partlaboristoj kreas certajn proporciojn inter la apartaj laboristaj grupoj, tiel en la strukturita maŝinsistemo, kie ĉiu partmaŝino konstante laborigas alian, kreas certan proporcion inter ilia nombro, ilia grandeco kaj ilia rapideco. La kombinita labormaŝino, nun strukturita sistemo de diverstip-aj unuopaj labormaŝinoj kaj de grupoj da ili, estas des pli perfekta, ju pli kontinua ĝia tuta procezo estas, do kun ju malpli da interrompoj la krudmaterialo iras de sia unua fazo al sia lasta, do ju pli la meĥanismo mem, anstataŭ la homa mano, transportas ĝin de unu produkta fazo en la alian. En la manufakturo la izolado de la apartaj procezoj estas principo trudita de la labordivido mem, sed ĉie tie, male, en la plene evoluinta fabriko nepre regas la kontinueco de la apartaj procezoj.

Maŝinsistemo, egale ĉu ĝi baziĝas sur nura kunlaborado de samspecaj labormaŝinoj, kiel en teksejo, aŭ sur kombinado de diversspecaj, kiel en ŝpinejo, per si mem konsistigas grandan aŭtomaton, ekde kiam ĝi estas movata de memaganta unua motoro. Tamen la tuta sistemo moveblas ekz-e de vapormaŝino, kvankam kelkaj ilmaŝinoj ankoraŭ bezonas por certaj movoj la laboriston, ekz-e la movo necesa por enmeti la ŝpinilon antaŭ la enkonduko de la memaga ŝpinmaŝino kaj ankoraŭ daŭre ĉe fajnŝpinado, aŭ kiam certaj partoj de la maŝino, kvazaŭ ilo, gvidendas de laboristo,

eliminita, kun la escepto de tiaj apartaj laboroj, ĉe kiuj oni ankoraŭ preferas permane kombitan lanon. Multaj el tiuj mankombistoj trovis laboron en la fabrikoj, sed la laborprodukto de la mankombisto estas, kompare kun tiu de la maŝino, tiom malgranda, ke tre granda nombro da kombistoj restis sendunga.” (*Rep. of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1856*, p. 16)

124 „La principo de la fabriksistemo konsistas do en tio … anstataŭigi la dividon aŭ laŭŝtupigon de la laboro inter la unuopaj metiistoj per divido de la laborprocezo laŭ ĝiaj esencaj konsistigaj partoj.” (Ure, l.c., p. 20)

ekz-e ĉe konstruado de maŝinoj antaŭ la transformado de la *slide rest* (tornaparato) en memagantan aŭtomaton (*self-actor*). Ekde kiam la labormaŝino faras ĉiujn movojn necesajn por prilabori la krudmaterialon kaj bezonas jam nur homan akompanadon, ni havas aŭtomatan sistemon de maŝinaro, kiu tamen konstante plibonigeblas en la detalo. Ekzemple la aparato, kiu memstare haltigas la ŝpinmaŝinon ekde kiam iu fadeno ŝiriĝis, kaj la memaganta haltigilo, kiu haltigas la plibonigitan teksilon, ekde kiam la bobeno de la navedo estas sen veftofadeno, estas tute moderna inventaĵo. La paperfabriko povas servi kiel ekzemplo por kontinueco de la produktado kaj por plenumado de la aŭtomata principo. Entute ĉe la paperproduktado detale studeblas la diferenco de diversaj produktadmanieroj, surbaze de malsamaj produktadrimedoj, kaj la rilato de la sociaj produktadkondiĉoj kun tiuj produktadmanieroj, ĉar la malnova germana paperfarado liveras al ni la modelon de la metia produktado, Nederlando en la 17-a kaj Francio en la 18-a jarcento modelojn de la propradira manufakturo kaj la moderna Anglio la modelon de la aŭtomata fabrikado en tiu branĉo, krome en Ĉinio kaj Hindio ekzistas ankoraŭ du diversaj malnovaziaj formoj de la sama industrio.

La maŝinsistemo posedas sian plej evoluintan formon kiel strukturita sistemo de labormaŝinoj, kiuj ricevas sian movon nur per la transmisia maŝinaro el centra aŭtomato. Sur la lokon de la unuopa maŝino venas ĉi tie meĥanika monstro, kies korpo plenigas tutajn fabrikkonstruaĵojn kaj kies demona forto, unue kaŝita de la preskaŭ solene mezurita moviĝo de siaj gigantaj membroj, erupcias en febre frenezan dancadon de siaj sennombraj propradiraj labororganoj.

Ekzistis meĥanikaj ŝpiniloj, vapormaŝinoj ktp, antaŭ ol ekzistis laboristoj, kies ekskluziva tasko estis fari vapormaŝinojn, ŝpinilojn ktp, same kiel la homo portis vestaĵojn antaŭ ol ekzistis tajloroj. Sed la inventoj de Vaucanson, Arkwright, Watt ktp realigeblis nur ĉar tiuj inventistoj disponis pri konsiderinda kvanto da lertaj meĥanikaj laboristoj prete liveritajn de la manufaktura periodo. Parto de tiuj laboristoj konsistis el diversprofesiaj sendependaj metiistoj, alia estis kunigita en manufakturoj, en kiuj, kiel antaŭe menciite, tre severe regis la labordivido. Kun la pliiĝo de la inventoj kaj kun la kreskanta postulo je nove inventitaj maŝinoj evoluis unuflanke pli kaj pli la apartigo de la maŝinfabrikado en diversajn memstarajn branĉojn, aliflanke la labordivido interne de la maŝinkonstruantaj manufakturoj. Ni vidas do ĉi tie en la manufakturo la rektan teĥnikan bazon de la granda industrio. La manufakturo produktis la maŝinaron, per kiu la granda industrio en la produktadaj sferoj kiujn ĝi akaparis unue,

dissolvis la metian kaj manufakturan sistemon. La maŝinsistemo leviĝis do sponte sur materia bazo kiu estis maltaŭga por ĝi. Ekde certa evolugrado ĝi devis mem revolucii tiun bazon, kiun ĝi unue trovis preta kaj poste en ĝia malnova formo pli ellaboris, kaj krei novan bazon kongruan kun sia propra produktadmaniero.

Same kiel la unuopa maŝino restas nana tiom longe kiom ĝi estas movata nur de homoj, kiel la maŝinsistemo ne povis libere evolui antaŭ ol la vapormaŝino anstataŭis la nature trovitajn movfortojn – bestojn, venton kaj eĉ akvon –, same la evoluo de la granda industrio estis tiom longe paralizita, kiom ĝia tipa produktadrimedo, la maŝino mem, dankis sian ekzistadon al persona forto kaj al persona lerteco, do dependis de forto de muskolo, de akreco de vido, de virtuozeco de mano, per kiuj la partlaboristo en la manufakturo kaj la metiisto ekster ĝi gvidis sian ileton.

Sendepende de la altaj kostoj de la maŝinoj fabrikitaj tiel – kaj tio estas afero de la industrikapitalo – la progreso de industrioj jam bazitaj sur la meĥanika produktado kaj ilia enkonduko en novaj branĉoj, restis tute dependa de unu kondiĉo: la kresko de kategorio de laboristoj, kiuj pro la duonartista naturo de iliaj taskoj pliigeblis nur iom post iom kaj ne per salto. Sed sur certa evoluŝtupo la granda industrio fariĝis ankaŭ teĥnike malkongrua kun sia metia kaj manufaktura bazo. Ampleksiĝo de la movmaŝinoj, de la transmisia meĥanismo kaj de la ilmaŝinoj, pli granda komplikeco, varieco kaj pli rigora reguleco de iliaj partoj, en la mezuro laŭ kiu la ilmaŝino disiĝis disde sia metia modelo kiu origine determinis ĝian konstruiĝon kaj ricevis pli liberan formon determinitan nur de sia meĥanika tasko,[125] elformiĝo de la aŭtomata sistemo kaj ĉiam pli neevitebla aplikado de malfacile pritraktebla materialo, ekz-e de fero anstataŭ ligno – la solvo de ĉiuj ĉi nature estiĝantaj taskoj trafis ĉie sur personaj baroj, kiujn la eĉ en la manufakturo kombinita laborista personaro trarompas nur laŭgrade, ne laŭ la esenco. Maŝinoj, kiaj ekz-e la moderna presilo, la moderna vaporteksilo kaj la moderna kardmaŝino, ne

125 La meĥanika teksilo en sia unua formo konsistas ĉefe el ligno, la plibonigita, moderna, el fero. Kiom komence la malnova formo de la produktadrimedo determinas sian novan formon, tion montras i.a. la plej supraĵa komparo de la moderna vaporteksilo kun la malnova, de la modernaj bloviloj en fergisejoj kun la unua mallerta meĥanika renaskiĝo de la ordinara balgoblovilo, kaj eble pli okulfrape ol ĉio alia: lokomotivo provita antaŭ la invento de la nuntempaj lokomotivoj, kiu havis efektive du piedojn, kiujn ĝi alterne levis kiel ĉevalo. Nur post plua evoluo de la meĥaniko kaj kun akumulita praktika sperto la formo estas tute determinata de la meĥanika principo kaj pro tio komplete emancipita el la tradiciita korpa formo de la ilo kiu transformiĝas al maŝino.

livereblis de la manufakturo.

La revolucio de la produktadmaniero en unu sfero de la industrio necesigas ĝian revolucion en alia. Tio veras unue por tiaj industribranĉoj, kiuj, kvankam izolitaj per la socia labordivido, tiel ke ĉiu el ili produktas individuan varon, tamen interplektiĝas kiel fazoj de tuta procezo. Ekzemple la maŝinŝpinado necesigis maŝinteksadon kaj ambaŭ kune la meĥanikan-ĥemian revolucion en la blankigado, presado kaj kolorigado. Tiel aliflanke la revolucio en la kotonŝpinado instigis al invento de la sensemigilo (*gin*), por disigi la kontonfibron disde la semoj, per kiu la kotonproduktado fariĝis nun grandskale ebla.[126] Sed la revolucio en la produktadmaniero de industrio kaj kampkulturo necesigis speciale ankaŭ revolucion en la ĝeneralaj kondiĉoj de la socia produktadprocezo, t.e. en la komunikad- kaj transport-rimedoj. Same kiel la komunikad- kaj transport-rimedoj de socio, kies pivoto – por uzi esprimon de Furiero[127] – estis la malgranda kampkulturo kun sia hejma flankindustrio kaj la urba metisistemo, jam tute ne povis kontentigi al la produktadbezonojn de la manufakturperiodo kun ĝia ampleksiĝinta labordivido, ĝia koncentriĝo de laborrimedoj kaj de laboristoj kaj ĝiaj koloniaj merkatoj, kaj pro tio estis efektive revoluciigitaj, tiel ankaŭ la transport- kaj komunik-rimedoj tradiciitaj el la manufakturperiodo fariĝis baldaŭ neelteneblaj baroj por la granda industrio kun ĝia fibreca rapido de produktado, ĝia granda skalo, ĝia konstanta ĵetado de amasoj da kapitalo kaj da laboristoj el unu produktada sfero en la alian kaj kun ĝiaj nove kreitaj mondmerkataj rilatoj. Sendepende de tute revoluciigita konstruado de velŝipoj, la komunikad- kaj transport-sistemo estis do iom post iom adaptita al la produktadmaniero de la granda industrio per sistemo de rivervaporŝipoj, fervojoj, oceanaj vaporŝipoj kaj telegrafoj. Sed la teruraj amasoj da fero, kiuj estis nun forĝotaj, veldotaj, tranĉotaj, borotaj kaj formotaj, postulis siavice ciklopajn maŝinojn, kies kreado ne eblis en la manufaktureca maŝinkonstruado.

La granda industrio devis do akapari sian tipan produktadrimedon, la maŝinon mem, kaj produkti maŝinojn per maŝinoj. Nur tiel ĝi kreis sian adekvatan teĥnikan bazon kaj metis ĝin sur ties proprajn piedojn. Kun la kreskanta maŝinsistemo en la unuaj jardekoj de la 19-a jarcento la maŝinoj

126 La sensemigilo *cottongin* de la jankio Eli Whitney restis ĝis lastatempe en la esenco pli senŝanĝa ol ia ajn alia maŝino de la 18-a jarcento. Nur en la lastaj jardekoj (antaŭ 1867) alia usonano, s-ro Emery de Albany, Novjorko, arĥaikigis la maŝinon de Whitney per same simpla kiel efika plibonigo.

127 Charles François Fourier [ŝárl frasŭá furié] (1772-1837). -vl

akaparis efektive iom post iom la fabrikadon de ilmaŝinoj. Sed nur dum la lastaj jardekoj la giganta konstruado de fervojoj kaj de oceanaj vaporŝipoj naskis la konstruadon de la ciklopaj maŝinoj uzataj por konstruado de ĉefmotoroj.

La plej esenca produktadkondiĉo por fabrikado de maŝinoj per maŝinoj estis movmaŝino kapabla je ĉia forto kaj tamen samtempe tute kontrolebla. Ĝi ekzistis jam en la vapormaŝino. Sed necesis samtempe produkti per maŝinoj la strikte geometriajn formojn kiel linio, ebeno, cirklo, cilindro, konuso kaj globo, necesaj por detalaj partoj de la maŝinoj. Tiun problemon solvis Henry Maudslay en la unua jardeko de la 19-a jarcento per la invento de la *slide rest*, kiu estis baldaŭ aŭtomatigita kaj en modifita formo transigita de la tornilo, por kiu ĝi estis unue konceptita, al aliaj konstrumaŝinoj. Tiu meĥanika ilo anstataŭas ne ian apartan ilon, sed la homan manon mem, kiu produktas certan formon, per tenado kaj gvidado de la klingo de tranĉinstrumentoj ktp kontraŭ aŭ super la labormaterialo, ekz-e fero. Tiel oni sukcesis produkti la geometriajn formojn de la maŝinpartoj „en grado de facileco, precizeco kaj rapideco, kiun nenia akumulita sperto de mano de la plej lerta laboristo povis doni.”[128]

Se ni konsideras nun tiun parton de la maŝinaro aplikata al konstruado de maŝinoj, kiu konsistigas la proprasencan ilmaŝinon, tiam la metia ilo reaperas, sed en ciklopa amplekso. La aganto de la bormaŝino ekz-e estas giganta borilo, movata de vapormaŝino kaj sen kiu la cilindroj de grandaj vapormaŝinoj kaj de hidraŭlikaj premmaŝinoj ne produkteblus. La meĥanika tornilo estas la ciklopa renaskiĝo de la ordinara piedtornilo, la rabotmaŝino fera ĉarpentisto kiu laboras per la samaj iloj pri fero, per kiuj la ĉarpentisto laboras pri ligno; la ilo kiu en la londonaj ŝipkonstruejoj tranĉas la plakitajn tabulojn, estas giganta razilo, la ilo de la tondmaŝino, kiu tranĉas feron, kvazaŭ la tajlora tondilo tukon, monstra tondilego, kaj la vapormartelo agas per ordinara martelkapo, sed de tia pezo ke eĉ Toro[129] ne povus ĝin svingi. Unu el tiuj vapormarteloj ekz-e, kiuj estas

128 „*The Industry of Nations*”, Londono, 1855, parto 2, p. 239. Tie staras: „Kvankam tiu akcesoraĵo al la tornilo povas ŝajni tiom simpla kaj ekstere sensignifa, ni kredas tamen ne aserti tro, se ni konstatas, ke ĝia influo sur la pli bona kaj pli etendita aplikado de maŝinoj estis same granda kiel tiu kaŭzita de la plibonigoj de la vapormaŝino fare de Watt. Ĝia enkonduko tuj sekvigis perfektigon kaj malplikostigon de ĉiaj maŝinoj kaj kondukis al pliaj inventoj kaj plibonigoj.”

129 En Londono ekzistas tia maŝino, uzata por forĝi *paddel-wheelshaft*, al kiu oni donis la nomon „Toro” („*Thor*”). Tiu maŝino forĝas gisblokon de 16 ½ tunoj kun la sama facileco kun kiu forĝisto forĝas hufferon. – Ĉe la antikvaj

inventaĵo de Nasmyth, pezas pli ol 6 tunojn kaj falegas el distanco de 7 piedoj al amboso de 36-tuna pezo. Li facile pulvorigas granitblokon kaj estas ne malpli kapabla enpremi najlon en molan lignon per sinsekvo de mallaŭtaj batoj.[130]

En formo de maŝino, la laborrimedo ricevas materian ekzistadmanieron, kiu necesigas anstataŭigi homforton per naturfortoj kaj laŭspertan rutinon per konscia aplikado de naturscienco. En la manufakturo la strukturado de la socia laborprocezo estas pure subjektiva, kombinado de partlaboristoj; en la maŝinsistemo la granda industrio posedas tute objektivan produktadmeĥanismon, kiun la laboristo trovas preta kiel materia produktadkondiĉo. En la simpla kunlaborado kaj eĉ en tiu specifita per labordivido, la anstataŭigo de la unuopa laboristo per la sociiĝinta montriĝas ankoraŭ pli aŭ malpli hazarda. La maŝinsistemo, kun kelkaj poste menciindaj esceptoj, funkcias nur en la mano de rekte sociigita aŭ komuna laboro. La kunlaboreco de la laborprocezo fariĝas do nun teĥnika neceso diktata de la naturo de la laborrimedo mem.

## 2. Valortransdono de la maŝinaro al la produkto

Ni vidis, ke la produktadfortoj, kiuj fontas el kunlaborado kaj labordivido, kostas neniom al la kapitalo. Ili estas naturfortoj de la socia laboro. Naturfortoj, kiel ekz-e vaporo, akvo ktp, kiuj estas alproprigataj por produktaj procezoj, kostas ankaŭ neniom. Sed kiel la homo bezonas sian pulmon por spiri, li bezonas, por produktante konsumi naturfortojn, „ion hommane faritan”. Akvorado necesas por ekspluati la movforton de la akvo, vapormaŝino, por ekspluati tiun de la vaporo. Kiel pri la naturfortoj, tiel statas pri la scienco. La leĝo pri la devio de la magnetnadlo en la atingopovo de elektra kurento aŭ la leĝo pri estigo de magnetismo en fero ĉirkaŭ kiu rondiras elektra kurento, kostas, post sia malkovro, absolute neniom.[131] Sed por ekspluati tiujn leĝojn por telegrafio ktp necesas tre

ĝermanoj, ĉefe ĉe la skandinavoj, Toro estas la dio de la milito, filo de Odino (malnovĝermana dio). -vl

130 La prilignaj maŝinoj, aplikeblaj ankaŭ etskale, estas plej ofte usona invento.

131 La scienco kostas al la kapitalisto absolute „neniom”, kio tute ne malhelpas lin ekspluati ĝin. La „fremda” scienco estas enkorpigita al la kapitalo kiel fremda laboro. Sed „kapitalisma” alproprigo kaj „persona” alproprigo, ĉu de scienco, ĉu de materia riĉaĵo, estas du tute malsamaj aferoj. D-ro Ure mem lamentas pri la kruda nescio de siaj karaj fabrikistoj, kiuj ekspluatas maŝinojn, pri

multekosta kaj ampleksa aparato. Kiel ni vidis, la maŝino ne forigas la ilon. Tiu ileto de homa organismo kreskas amplekse kaj nombre al ilo de homkreita meĥanismo. La kapitalo igas la laboriston nun labori, anstataŭ per mana ilo, per maŝino kiu gvidas siajn ilojn mem. Se do unuavide klaras, ke la granda industrio per enkorpigo de gigantaj naturfortoj kaj de la naturscienco en la produktadprocezon devas eksterordinare altigi la produktivon de la laboro, tute ne same klaras, ke aliflanke tiu pli alta produktivo ne estas aĉetita per plia elspezo de laboro. Same kiel ĉiu alia parto de la konstanta kapitalo la maŝinaro ne kreas valoron, sed donas la sian al la produkto por kies fabrikado ĝi servas. Tiom, kiom ĝi havas da valoro kaj pro tio transigas valoron al la produkto, ĝi fariĝas parto de la valoro de tiu produkto. Anstataŭ igi ĝin malpli kosta, ĝi plikostigas ĝin en proporcio al sia propra valoro. Kaj evidentas, ke maŝino kaj evoluinta maŝinaro, la tipa laborrimedo de la granda industrio, ŝveligas sian valoron en tute alia dimensio, kompare kun la laborrimedoj de metia kaj manufaktura sistemo.

Nun rimarkendas unue, ke la maŝinoj eniras ĉiam tute en la laborprocezon kaj ĉiam nur parte en la plivalorigprocezon. Ĝi aldonas neniam pli da valoro ol ĝi mezume perdas per sia eluziĝo. Okazas do granda diferenco inter la valoro de la maŝinoj kaj la valorparto periode transigata de ili al la produkto. Okazas granda diferenco inter la maŝino kiel valorestiga kaj kiel produktestiga elemento. Ju pli granda la periodo, dum kiu la sama maŝinaro servas ripete en la sama laborprocezo, des pli granda estas tiu diferenco. Tamen ni vidis, ke ĉiu propradira laborrimedo aŭ produktadinstrumento eniras en la laborprocezon ĉiam tute kaj en la plivalorigprocezon ĉiam nur popece, en proporcio al sia ĉiutaga mezuma eluziĝo. Sed tiu diferenco inter uzado kaj eluziĝo estas multe pli granda ĉe maŝino ol ĉe ilo, ĉar ĝi, konstruita el pli daŭrema materialo, vivas pli longe, ĉar ĝia aplikado, reguligita de strikte sciencaj leĝoj, ebligas pli grandan ŝparon en la elspezo de ĝiaj konsistigaj partoj kaj de ĝiaj konsumrimedoj, kaj fine, ĉar ĝia kampo de produktado estas senfine pli granda ol tiu de la ilo. Se ni deprenas de ambaŭ, de la maŝino kaj de la ilo, iliajn ĉiutagajn mezumajn kostojn aŭ la valorparton kiun ili per ĉiutaga mezuma eluziĝo kaj la konsumado de helpsubstancoj, ekz-e oleo, karbo ktp, aldonas al la produkto, tiam ili agas senkoste, tute kiel naturfortoj sen aldono de homa laboro. Ju pli grandas la produkta povo de la maŝinaro kompare kun tiu de la ilo, des pli grandas la senpaga servo kompare kun tiu de la ilo. La homo lernas por la unua fojo en la granda industrio igi

meĥaniko, kaj Liebig povas rakonti pri la harstariga nescio de la anglaj ĥemiaj fabrikistoj pri ĥemio.

senpage kaj grandskale efiki la produkton de sia pasinta, jam konkretigita laboro kiel naturforton.[132]

Ĉe la analizo de la kunlaborado kaj manufakturo montriĝis, ke certaj ĝeneralaj produktadkondiĉoj, ekz-e konstruaĵoj ktp, kompare kun la disaj produktadkondiĉoj de unuopaj laboristoj estas pli ŝparaj pro la komuna konsumado, kaj pro tio malpli plikostigas la produkton. En la maŝinsistemo ne nur la korpo de labormaŝino estas konsumata de siaj multaj iloj, sed ankaŭ la sama movmaŝino kaj parto de la transmisia meĥanismo estas konsumataj komune de multaj labormaŝinoj.

Se estas donita la diferenco inter la valoro de la maŝinoj kaj la valorparto transdonata de ili al ilia taga produkto, tiam la grado, en kiu tiu valorparto plikostigas la produkton, dependas unue de la amplekso de la produkto, kvazaŭ de ĝia surfaco. S-ro Baynes el *Blackburn* taksas en prelego publikigita en 1857, ke

„ĉiu reala meĥanika ĉevalpovo[133] movas 450 ŝpinilojn de aŭtomata ŝpinmaŝino

132 Ricardo konsideras tiun – cetere de li ne disvolvitan, same kiel la ĝeneralan diferencon inter laborprocezo kaj plivalorigprocezo – efikon de la maŝinoj kelkfoje kun tiom da emfazo, ke li okaze forgesas la valorparton kiun la maŝinoj transdonas al la produkto, kaj ke li tute konfuzas ilin kun la naturfortoj. Tiel ekz-e „Adam Smith nenie subtaksas la servojn, kiujn naturfortoj kaj maŝinoj faras al ni, sed li tre ĝuste distingas la naturon de la valoro, kiun ili aldonas al la varoj … ĉar ili faras sian laboron senpage, ilia helpo farita al ni neniom aldonas al la interŝanĝvaloro”. (Ricardo, l.c., p. 336, 337) La rimarko de Ricardo estas kompreneble ĝusta kontraŭ J. B. Say, kiu fantazias ke la maŝinoj faras la „servon” krei valoron kiu estas parto de la „profito”.

133 Noto al la 3-a eld.: „Ĉevalpovo” egalas al la forto de 33.000 piedfuntoj minute, do al la forto, kiu levas 33.000 funtojn en la minuto je 1 piedo (angla) aŭ 1 funton je 33.000 piedoj. Tiu estas la supre celata ĉevalpovo. En la ordinara aferlingvo kaj ankaŭ ie kaj tie en citaĵoj de tiu ĉi libro oni distingas inter „nominalaj” kaj „komercaj” aŭ „indicitaj” ĉevalpovoj de la sama maŝino. La malnova aŭ nominala ĉevalpovo estas kalkulata ekskluzive el iro de piŝto kaj cilindra diametro kaj tute ne konsideras vaporpremon kaj piŝtan rapidon. Tio signifas, ke ĝi fakte eldiras: Tiu vapormaŝino havas ekz-e 50 ĉevalpovon, se ĝi estas funkciigata per la sama malforta vaporpremo kaj la sama malalta piŝtrapido kiel en la epoko de Boulton kaj Watt. Sed la du lastaj faktoroj de tiam eksterordinare kreskis. Por reale mezuri hodiaŭ la meĥanikan forton liveratan de maŝino, oni inventis la indicilon, kiu montras la vaporpremon. La rapido de la piŝto estas facile konstatebla. Tiel la mezuro de la „indicita” aŭ „komerca” ĉevalpovo de maŝino estas matematika formulo, kiu samtempe konsideras la cilindran diametron, la altecon de la piŝto-iro, la piŝtrapidon kaj la vaporpremon kaj per tio indikas, kiom ofte la maŝino reale povas levi

aŭ ducent ŝpinilojn de la *throstle*, aŭ dek kvin teksilojn por kvardek-cola tuko kune kun la instalaĵoj por munti la varpon, ŝliĥti ktp."

En la unua kazo, la ĉiutagaj elspezoj de unu ĉevalpovo kaj la eluziĝo de la maŝino kiun ĝi movas distribuiĝas al la produkto de 450 ŝpiniloj de la ŝpinmaŝino; en la dua, al la produkto de ducent ŝpiniloj de la *throstle*, kaj en la tria, al tiu de dek kvin meĥanikaj teksiloj, tiel ke al unco da fadeno aŭ ulno da teksaĵo nur tre eta valorparto transdoniĝas. Same en la supra ekzemplo pri al vapormartelo. Ĉar ĝia ĉiutaga eluziĝo, karbkonsumo ktp distribuiĝas al la teruraj kvantoj da fero, kiujn ĝi ĉiutage martelas, ĉiu funtocento sorbas nur tre etan valorparton, kiu estus tre granda, se la ciklopa instrumento devus enmarteli malgrandajn najlojn.

Kun donita laborkapablo de maŝino, do la nombro da agantaj iloj aŭ, kiam temas pri forto, ilia maso, la kvanto de ĝia produkto dependas de la rapido per kiu ĝi agas, do ekz-e de la rapido per kiu ŝpinilo turniĝas, aŭ la kvanto da batoj kiujn la martelo donas en unu minuto. Kelkaj el tiuj kolosaj marteloj donas sepdek batojn, la forĝopatenta maŝino de Ryder, kiu uzas vapormartelojn en pli malgrandaj dimensioj por forĝado de ŝpiniloj, donas sepcent batojn en unu minuto.

Kun donita proporcio, en kiu la maŝino transdonas valoron al la produkto, la grando de tiu valorparto dependas de ĝia propra valorgrando.[134] Ju malpli da valoro ĝi entenas mem, des malpli ĝi transdonas al la produkto. Ju malpli da valoro ĝi transdonas, des pli produktiva ĝi estas kaj des pli ĝia servo proksimiĝas al tiu de la naturfortoj. Sed la produktado de maŝinoj per maŝinoj malpliigas ilian valoron, proporcie al ilia etendiĝo kaj efikeco.

Kompara analizo de la prezoj de metie aŭ manufakture produktitaj varoj kaj de la prezoj de la samaj varoj kiel maŝinproduktoj donas ĝene-

33.000 piedfuntojn minute. Unu nominala ĉevalpovo povas do reale plenumi tri, kvar aŭ eĉ kvin „indicitajn" aŭ „realajn" ĉevalpovojn. Jen por klarigo de diversaj postaj citaĵoj. – F. E.}

134 La leganto kun antaŭjuĝoj de kapitalistaj ideoj kompreneble miras ĉi tie, ke ne temas pri la „interezo", kiun la maŝino, proporcie al sia kapitalvaloro, aldonas al la produkto. Sed estas facile komprenebla, ke la maŝino, ĉar ĝi kiel ia ajn alia parto de la konstanta kapitalo ne kreas novan valoron, ne povas aldoni ion tian sub la nomo „interezo". Krome klaras, ke ĉi tie, kie temas pri la produktado de plusvaloro, oni ne povas apriore supozi ian parton de ĝi sub la nomo „interezo". La kapitalista kalkulmaniero, kiu unuavide ŝajnas absurda kaj kontraŭa al la leĝoj de valorestiĝo, estas klarigataj en la Tria Libro de tiu ĉi verko.

rale la rezulton, ke ĉe la maŝinprodukto la valorparto ŝuldata al la laborrimedo relative kreskas, sed absolute malkreskas. Tio signifas, ke ĝia absoluta grando malkreskas, sed ĝia grando kompare kun la ĉiomvaloro de la produkto, ekz-e de funto da fadeno, kreskas.[135]

Evidentas, ke okazas nur deŝovo de la laboro, do la tuta sumo de la laboro necesa por produktado de varo ne malpliiĝas aŭ la produktadforto de la laboro ne pliiĝas, se la produktado de maŝino kostas tiom da laboro kiom ĝia aplikado ŝparas. Sed la diferenco inter la laboro kiun ĝi kostas, kaj la laboro kinj ĝi ŝparas, aŭ la grado de ĝia produktivo evidente ne dependas de la diferenco inter ĝia propra valoro kaj la valoro de la ilo kiun ĝi anstataŭas. La diferenco daŭras tiom longe, kiom la laborkostoj de la maŝino kaj do la valorparto kiun ĝi aldonas al la produkto restas malpli grandaj ol la valoro, kiun la laboristo per sia ilo aldonus al la laborobjekto. La produktivo de la maŝinoj mezuriĝas do per la grado, en kiu ĝi anstataŭas homan laborforton. Laŭ s-ro Baynes, 2½ laboristoj necesas por 450 ŝpiniloj kune kun la meĥanika preparmaŝino[136] movataj de unu vapora

135 Tiu valorparto transdonita de la maŝino falas absolute kaj relative, kie ĝi anstataŭas ĉevalojn, ĝenerale laborbestojn, kiuj estas uzataj nur kiel movforto. Ni rimarkigu preterpase, ke Kartezio kun sia difino de bestoj kiel nuraj maŝinoj vidas per la okuloj de la manufakturperiodo kontraste al la mezepoko, al kiu la besto estis konsiderata helpulo de la homo, kiel poste ree al s-ro von Haller en lia „*Restauration der Staatswissenschaften* [Renovigo de la ŝtatsciencoj]". Ke Kartezio same kiel Bako konsideris ŝanĝitan formon de produktado kaj praktikan dominadon de la homo super la naturo kiel rezulton de ŝanĝita pensmetodo, tion montras lia „*Discours de la Méthode*", kie i.a. staras: „Eblas (per la metodo kiun li enkondukis en la filozofion) atingi konojn, kiuj tre utilas por la vivo, kaj trovi, anstataŭ tiu spekula filozofio kiun oni instruas en la lernejoj, praktikan filozofion, per kiu ni, konante la agojn de fajro, de akvo, de aero, de la astroj, kaj de ĉiuj aliaj korpoj kiuj ĉirkaŭas nin – same precize kiel ni konas la diversajn metiojn de niaj metiistoj –, povus same apliki ilin por ĉiaj uzoj por kiuj ili taŭgas kaj tiel fariĝi mastroj kaj posedantoj de la naturo, ktp, kontribui al perfektigo de la homa vivo." En la antaŭparolo de Sir Dudley North: „*Discourses upon Trade*" (1691) legeblas ke, la metodo de Kartezio, aplikata al la politika ekonomio, komencis liberigi ĝin el ĉiaj superstiĉaj ideoj pri mono, komerco ktp. Sed mezume la anglaj ekonomikistoj de la pli frua tempo aliĝas al Bako kaj Hobbes kiel siaj filozofoj, dum Locke poste fariĝis „LA filozofo" de la politika ekonomio por Anglio, Francio kaj Italio.

136 Laŭ jarraporto de la komerca ĉambro de Eseno (oktobro 1863), la gisŝtalfabriko de Krupp produktis en la jaro 1862 per 161 fandfornoj, fornoj por ruĝigi la metalojn kaj cementfornoj, 32 vapormaŝinoj (en la jaro 1800 tio estis proksimume la tuta nombro de la vapormaŝinoj uzataj en Manĉestro) kaj 14

ĉevalpovo, ĉe kio dum dekhora labortago per ĉiu memaga ŝpinilo ŝpiniĝas 13 uncoj da fadeno (mezume), do semajne 365⅝ funtoj da fadeno. Ĉe sia transformiĝo al fadeno proksimume 366 funtoj da kotono (por simpligi ni ne konsideru la defalaĵon) sorbas do nur 150 laborhorojn aŭ 15 dekhorajn labortagojn, dum per la ŝpinrado, se la manŝpinisto liveras 13 uncojn da fadeno en 60 horoj, la sama kvanto da kotono sorbus 2.700 dekhorajn labortagojn.[137] Tie, kie la malnova metodo de blokpresado aŭ de la man-kotonpresado estis anstataŭigita per maŝinpresado, unu sola maŝino presas, kun la helpo de unu viro aŭ knabo, tiom da kvarkolora kotono en unu horo kiom antaŭe 200 viroj.[138] Antaŭ ol Eli Whitney 1793 inventis la koton-sensemigilon (*cotton gin*), la disigo de unu funto da kotono disde la semoj kostis mezuman labortagon. Pro lia invento gajneblas ĉiutage cent funtoj da kotono de unu maŝino („*negro”),* kaj la efikeco de la *gin* estis de tiam ankoraŭ konsiderinde altigita. Funto da kotono, antaŭe produktita je 50 cendoj, estis poste kun pli granda profito, do inkluzive de pli da nepagita laboro, vendata je 10 cendoj. En Hindio oni uzas por disigi fibrojn kaj semojn duonmaŝinan instrumenton, la *churka*, per kiu viro aŭ virino ĉiutage purigas 28 funtojn. Per la *churka* inventita antaŭ kelkaj jaroj de d-ro Forbes, unu viro kaj unu knabo produktas tage 250 funtoj; kie oni uzas bovojn, vaporon aŭ akvon kiel movfortojn, nur malmultaj knaboj kaj knabinoj necesas kiel *feeders*, do por enmeti la materialon en la maŝinon kaj elpreni ĝin. Dek ses tiaj maŝinoj, movataj per bovoj, faras ĉiutage la antaŭan mezuman taglaboron de 750 homoj.[139]

Kiel jam menciite, la vapormaŝino faras ĉe la vaporplugilo en unu horo je 3 pencoj aŭ ¼ ŝilingo same multan laboron kiel 66 homoj je 15 ŝilingoj hore. Mi revenas al tiu ekzemplo por eviti malĝustan ideon. La 15 ŝilingoj estas ja tute ne la esprimo de la laboro aldonita de la 66 homoj en unu horo. Se la proporcio de pluslaboro al necesa laboro estis 100 %, tiam tiuj 66 laboristoj produktis hore valoron de 30 ŝilingoj, kvankam nur 33 horoj prezentiĝas kiel ekvivalento por ili mem, do en la salajro de 15 ŝilingoj.

vapormarteloj, kiuj havis kune 1.236 ĉevalpovojn, 49 forĝejoj, 203 ilmaŝinoj kaj proksimume 2.400 laboristoj – 13 milionojn da funtoj de gisŝtalo. Tio signifas: eĉ ne du laboristoj por unu ĉevalpovo.

137 Babbage kalkulas, ke oni aldonas en Javo al la kotonvaloro 117 % nur per ŝpinlaboro. En la sama tempo (1832) en Anglio la tuta valoro, kiun maŝinaro kaj laboro aldonis al la fajnŝpinado, estis proksimume 33 % de la valoro de la krudmaterialo. („*On the Economy of Machinery*”, p. 165, 166)

138 Per maŝinpresado krome ŝpariĝas farbo.

139 Kp „*Paper read by Dr. Watson, Reporter on Products to the Government of India, before the Society of Arts*”, 17-a de aprilo 1860.

Se ni supozas do, ke maŝino kostas same multe kiel la jarsalajro de 150 laboristoj kiujn ĝi anstataŭas, do 3.000 sterlingajn pundojn,, tiam 3.000 pundoj tute ne estas la monesprimo de la laboro liverita de 150 laboristoj kaj aldonita al la laborobjekto, sed nur la monesprimo de tiu parto de ilia jarlaboro, kiu prezentiĝas por ili mem kiel salajro. Male, la monvaloro de la maŝino de 3.000 pundoj esprimas la tutan laboron elspezitan por produkti ĝin, sendepende de la proporcio laŭ kiu tiu laboro estas salajro por la laboristo kaj plusvaloro por la kapitalisto. Do, se la maŝino kostas same multe kiel la laborforto kiun ĝi anstataŭas, tiam la laboro konkretigita en ĝi mem estas ĉiam multe pli malgranda ol la viva laboro kiun ĝi anstataŭas.[140]

Se oni konsideras la maŝinon ekskluzive kiel rimedon por malplikostigo de la produkto, tiam la limo por ĝia uzado estas donita en tio, ke ĝia produktado kostas malpli da laboro ol ĝia uzado anstataŭas. Sed por la kapitalo tiu limo esprimiĝas pli strikta. Ĉar ĝi ne pagas la aplikatan laboron, sed la valoron de la aplikata laborforto, la uzado de la maŝinoj estas al ĝi limigita per la diferenco de la maŝinvaloro kaj la valoro de la laborforto kiun ĝi anstataŭas. Ĉar la divido de la labortago en necesa laboro kaj plusvaloro estas malsama en diversaj landoj, ĝi estas malsama ankaŭ en la sama lando dum diversaj periodoj aŭ dum la sama periodo en diversaj aferbranĉoj; ĉar krome la reala salajro de la laboristo jen falas sub la valoron de sia laborforto, jen kreskas super ĝin, la diferenco inter la prezo de la maŝino kaj la prezo de la per ĝi anstataŭigota laborforto povas tre varii, eĉ se la diferenco inter la laborkvanto necesa por produktado de la maŝino kaj la tuta kvanto de la laboro, kiun ĝi anstataŭas, restas la sama.[141] Sed estas nur la unua diferenco kiu determinas la produktadkostojn de la varo por la kapitalisto mem kaj influas lin per la devigaj leĝoj de la konkurenco. Pro tio oni inventas hodiaŭ en Anglio maŝinojn, kiuj estas uzataj nur en Nordameriko, kiel Germanio en la 16-a kaj 17-a jarcentoj inventis maŝinojn kiujn uzis nur Nederlando, kaj kiel pluraj francaj inventoj de la 18-a jarcentoj estis ekspluatataj nur en Anglio. La maŝino mem produktas en pli frue evoluintaj landoj, per sia uzado en kelkaj aferbranĉoj, en aliaj branĉoj tian superfluon de laboro (*redundancy of labour*, diras Ricardo), ke tie la falo de la salajro sub la

140 „Tiuj mutaj agantoj (la maŝinoj) estas ĉiam la produkto de multe malpli da laboro ol tiuj, kiujn ili anstataŭas, eĉ kiam ili havas saman valoron.” (Ricardo, l.c., p. 40)

141 *Noto al la 2-a eldono:* En komunisma socio la maŝinaro havus do tute alian agspacon ol en la burĝa socio.

valoron de la laborforto malebligas la uzadon de maŝinoj kaj igas ĝin, el la vidpunkto de la kapitalo, kies profito ĉiukaze fontas el la malpliiĝo ne de la aplikata laboro, sed de la pagata laboro, superflua kaj ofte malebla. En kelkaj branĉoj de la angla lanmanufakturo en la lastaj jaroj la infanlaboro estis tre malpliigita, ie kaj tie preskaŭ forigita. Kial? La fabrikleĝo devigis al duobla infanvico, el kiuj po unu laboras 6, la alia 4 horojn, aŭ ĉiu nur 5 horojn. Sed la gepatroj ne volis vendi la duontempulojn (*half-times*) pli malmultekoste ol antaŭe la plentempulojn (*full-times*). Pro tio oni anstataŭigis la duontempulojn per maŝinoj.[142] Antaŭ la malpermeso laborigi virinojn kaj infanojn (malpli ol 10-jarajn) en minejoj, la kapitalo trovis la metodon eluzi nudajn virinojn kaj knabinojn, ofte kunligitajn kun viroj, en karbaj kaj aliaj minejoj, tiom kongrue kun sia moralkodekso kaj ĉefe ankaŭ kun sia leĝaro, ke ĝi enkondukis maŝinojn nur post la malpermeso de tio, kaj ĉesigis tiujn *kapitalismajn geedziĝojn*.[143] La jankioj inventis maŝinojn por ŝtonrompado. La angloj ne uzas ilin, ĉar la „mizerulo” („*wretch*” estas la nomo de la angla politika ekonomio por kampkultura laboristo), kiu faras tiun laboron, ricevas pagon nur por tiom malgranda parto de sia laboro, ke maŝinoj plikostigus la produktadon por la kapitalisto.[144] En Anglio oni okaze daŭre uzas, anstataŭ ĉevalojn, ankoraŭ virinojn por tiri kanalboatojn[145], ĉar la laboro necesa por produktado de ĉevaloj kaj de maŝinoj estas matematike donita kvanto, dum la laboro necesa por vivteni virinojn, kiuj apartenas al la feĉo de la loĝantaro, estas sub ajna kalkulo. Pro tio oni trovas nenie pli senhontan malŝparon de homforto por malalta laboro ol ĝuste en Anglio, la lando de la maŝinoj.

---

142 „La dungistoj ne volas sennecese dungi du skipojn de infanoj sub dektrijaraj … Grupo de fabrikistoj, la ŝpinistoj de lanfadeno, uzas hodiaŭ malofte infanojn malpli ol dektrijarajn, t.e. duontempulojn. Ili enkondukis diversspecajn plibonigitajn kaj novajn maŝinojn, per kiuj dungado de infanoj (tio signifas malpli ol 13-jaraj) fariĝis tute superflua; kiel ekzemplon por ilustrado de tiu malpliigo de la nombro da infanoj mi menciu laborprocezon, ĉe kiu oni almuntis al la ekzistantaj maŝinoj aparaton, nomatan alpeciga maŝino, per kiu la laboro de ses aŭ kvar duontempuloj, laŭ la speco de ĉiu maŝino, plenumeblas de unu juna persono (pli ol 13-jara). La duontemp-sistemo stimulis la inventon de la alpeciga maŝino.” („*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1858*”, [p. 42, 43])

143 La lasta frazparto, post „malpermeso” inkluzive de la kursivigo, el la franca eldono. -vl

144 „Maŝinoj … ofte tiom longe ne aplikeblas, kiom la laboro (li celas salajron) ne kreskas.” (Ricardo, l.c., p.a 479)

145 Vd „*Report of the Social Science Congress at Edinburgh. Oct.* 1863”.

# 3. Tujaj efikoj de la maŝinsistemo sur la laboristo

La elirpunkto de la granda industrio estas, kiel montrite, la revolucio de la laborrimedo, kaj la revoluciigita laborrimedo ricevas sian plej evoluintan formon en la strukturita maŝinsistemo de la fabriko. Antaŭ ol rigardi, kiel oni enkorpigas hommaterialon en tiun objektivan organismon, ni vidu kelkajn ĝeneralajn efikojn de tiu revolucio sur la laboriston mem.

## *a) Alproprigo de kromaj laborfortoj fare de la kapitalo. Virin- kaj infan-laboro*

Per tio ke la maŝino superfluigas muskolforton, ĝi ebligas uzi laboristojn sen muskolforto aŭ kun nematura korpa evoluo, sed kun pli granda fleksiĝemo de iliaj membroj. Virin- kaj infan-laboro estis do la unua voko de la kapitalisma uzado de maŝinoj! Tiu potenca rimedo por anstataŭigi laboron kaj laboristojn per tio transformiĝis tuj en rimedon pliigi la nombron de salajruloj per envicigo de ĉiuj membroj de la laborista familio, sendistinge de sekso kaj aĝo, en la rektan komandon de la kapitalo. La deviga laboro trudata de la kapitalisto uzurpis ne nur la lokon de la infanludo, sed ankaŭ tiun de la libera laboro en la hejma rondo, ene de moderaj limoj por vivteno de la familio.[146]

La valoro de la laborforto estis determinita ne nur per la vivtenado de la individua plenkreska laboristo, sed per la labortempo necesa por vivtenado de la laborista familio. Per tio ke la maŝinsistemo ĵetas ĉiujn membrojn de la familio sur la labormerkaton, ĝi distribuas la valoron de la laborforto al lia tuta familio. Ĝi malplivalorigas do lian laborforton. La

146 D-ro Edward Smith, dum la kotonkrizo kiu akompanis la usonan internan militon, estis de la angla registaro sendita al *Lancashire, Cheshire* ktp, por raporti pri la sanstato de la kotonlaboristoj. Li raportis i.a.: El higiena vidpunkto la krizo havas, krom la forigon de la laboristoj el la fabrika etoso, diversajn aliajn avantaĝojn. La laboristedzinoj trovas nun la tempon necesan por mamsuĉigi siajn infanojn anstataŭ venenigi ilin per *Godfrey's Cordial* (narkotaĵo). Ili gajnis la tempon por lerni kuiri. Malfeliĉe tiu kuirarto okazis en momento, kiam ili havis nenion por manĝi. Sed oni vidas, kiom la kapitalo uzurpis por sia propra plivalorigo la familian laboron necesan por konsumado. Oni same uzis la krizon por instrui en propraj lernejoj kudradon al la filinoj de la laboristoj. Usona revolucio kaj monda krizo necesas por ke la laboristaj knabinoj, kiuj ŝpinadas por la tuta mondo, lernu kudri!

aĉeto de la familio parceligita ekz-e en kvar laborfortojn kostas eble pli ol antaŭe la aĉeto de la laborforto de la familiĉefo, sed per tio kvar labortagoj anstataŭas unu, kaj ilia prezo falas kompare kun la kroma pluslaboro de la kvar super la pluslaboro de la unu. Kvar devas nun liveri ne nur laboron, sed pluslaboron por la kapitalo, por ke la familio vivu. Tiel la maŝinsistemo dekomence etendas ne nur la homan ekspluatmaterialon, la plej propran ekspluatkampon de la kapitalo[147], sed samtempe la gradon de ekspluatado.

Ĝi same revolucias la formalan peradon de la kapitalrilatoj, la kontrakton inter laboristo kaj kapitalisto. Surbaze de la varinterŝanĝo estis unua kondiĉo ke kapitalisto kaj laboristo alpaŝu unu al la alia kiel liberaj personoj, kiel sendependaj varposedantoj, la unua kiel posedanto de mono kaj de produktadrimedoj, la alia kiel posedanto de laborforto. Sed nun la kapitalo aĉetas neplen- aŭ duonplen-aĝulojn. La laboristo vendis antaŭe sian propran laborforton, pri kiu li formale disponis kiel libera persono. Nun li vendas edzinon kaj infanon. Li fariĝas sklavkomercisto.[148] La

147 „La nombro da laboristoj tre kreskis, ĉar oni anstataŭigas ĉiam pli da viroj per virina laboro kaj precipe plenkreskulan laboron per infanlaboro. Tri knabinoj en la aĝo de 13 jaroj kun salajroj de 6 ĝis 8 ŝilingoj semajne anstataŭis plenkreskan viron kun salajro de 18 ĝis 45 ŝilingoj.” (Th. de Quincey: *„The Logic of Politic. Econ.”*, Londono, 1844, noto al p. 147) Ĉar certaj funkcioj de la familio, ekz-e vartado kaj suĉigado de la infanoj ktp, ne tute subpremeblas, la familiaj patrinoj konfiskitaj de la kapitalo devas pli aŭ malpli dungi anstataŭantojn. La laboroj necesaj por la familia konsumo, ekz-e kudrado, flikado ktp, estas anstataŭigendaj per aĉetado de pretaj varoj. La pli malalta elspezo de hejma laboro estas do kompensata per pli alta monelspezo. Pro tio la produktadkostoj de la laborista familio kreskas kaj kompensas la pliajn enspezojn. Aldoniĝas ke ŝpara kaj laŭcela preparado kaj konsumado de la vivrimedoj fariĝas maleblaj. Pri tiuj faktoj, kaŝataj de la oficiala politika ekonomio, oni trovas abundan materialon en la raportoj de la fabrikinspektistoj, de la komisiono pri infandungo (*Children's Employment Commission*) kaj speciale ankaŭ en la raportoj pri publika sano (*Reports on Public Health*).

148 Kontraste al la granda fakto, ke la limigo de la virin- kaj infan-laboro en la anglaj fabrikoj estis elbatalita de la plenkreskaj viraj laboristoj, oni trovas ankoraŭ en la ĵusaj raportoj de la komisiono pri infandungo vere abomenajn kaj ja sklavkomercajn trajtojn de laboristaj gepatroj koncerne infanŝakrado. Sed la kapitalista hipokritulo, kiel videblas el la samaj raportoj, denuncas tiun kruelecon de li mem kreitan, eternigitan kaj ekspluatatan, kiun li alie nomas „libereco de la laboro”. „Oni uzis laboron de malgrandaj infanoj … eĉ por labori por sia propra ĉiutaga pano. Sen la forto elteni tian supermezure pezan, sen instruado kiu utilus por ilia estonta vivo, ili estis enpuŝitaj en korpe kaj morale poluitan medion. La juda historiisto rimarkigis pri la detruado de

postulo je infanlaboro similas ofte eĉ en la formo la postulon je nigrulaj sklavoj, kiel oni kutimis legi en usonaj gazetanoncoj.

> „Mia atento”, diras ekz-e angla fabrikinspektisto, „estis direktita al anonco en la loka gazeto de unu el la plej gravaj manufakturaj urboj de mia distrikto, el kiu jena kopio: Bezonata 12 ĝis 20 knaboj, ne pli junaj ol kio povas ŝajni 13-jara. Salajro 4 ŝ. semajne. Informoj ĉe ktp.”[149]

La parolturno „kio povas ŝajni 13-jara” referencas la fakton ke laŭ la fabrikleĝo infanoj malpli ol 13-jaraj rajtas labori nur ses horojn. Oficiale kvalifikita kuracisto (*certifying surgeon*) devas atesti la aĝon. La fabrik-estro postulas do knabojn kiuj aspektas kvazaŭ ili estus jam dektrijaraj. La kelkfoje subita malaltiĝo de la nombro da infanoj malpli aĝaj ol 13 jarojn dungitaj de fabrikestroj, kiu aperis surprize en la angla statistiko de la lastaj dudek jaroj, estis laŭ eldiro de la fabrikinspektistoj mem grandparte la faro de *certifying surgeons*, kiuj laŭ la ekspluatemo de la kapitalistoj kaj la ŝakradbezono de la gepatroj altigis la aĝon de la infanoj. En la fifama londona distrikto de *Bethnal Green* ĉiun lundan kaj mardan maten-on okazas malfermita bazaro, kie geinfanoj ekde la 9-a jaraĝo vendas sin mem al la silkmanufakturistoj. „La kutimaj kondiĉoj estas 1 ŝilingo 8 pencoj semajne (kiuj apartenas al la gepatroj) kaj 2 pencoj por mi mem krom teo,” eldiras infano. La kontraktoj validas nur por semajno. La scenoj kaj la lingvo dum la daŭro de tiu bazaro estas vere abomenaj.[150] En Anglio daŭre okazas ke virinoj prenas „knabojn de la workhouse kaj luas ilin al ĉiu ajn aĉetanto por 2 ŝilingoj 6 pencoj semajne”.[151] Malgraŭ la fabrikleĝo daŭre almenaŭ 2.000 knaboj estas en Britio vendataj de siaj propraj gepatroj kiel vivantaj kamentubistaj maŝinoj (kvankam maŝinoj por anstataŭi ilin ja ekzistas).[152]

La maŝinoj kaŭzis tian revolucion en la jurrilatoj inter aĉetanto kaj

---

Jerusalemo fare de Tito, ke ne estis miraklo, ke la urbo estis neniigita, tiom komplete neniigita, ke senhomiĝinta patrino oferis sian propran idon por kontentigi la avidon de senkompata malsato.” („*Public Economy Concentrat-ed*”, Carlisle, 1833, p. 66)

149 A. Redgrave, en: „*Reports of Insp. of Fact. for 31st October 1858*”, p. 40, 41.

150 „*Children's Employment Commission, V. Report*”, Londono, 1866, p. 81, noto 31.

*Noto al la 4-a eld.:* La silkindustrio de *Bethnal Green* estas nun preskaŭ neniigita. – F. E.

151 *Child. Employm. Comm., III. Report*”, Londono, 1864, p. 53, noto 15.

152 l.c., „*V. Report*”, p. XXII, noto 137.

vendanto de laborforto, ke la tuta transakcio perdis eĉ la ŝajnon de kontrakto inter liberuloj. Tio donis poste al la angla parlamento la juran pretekston de ŝtata interveno en la reĝimon de la fabrikoj. Ĉiufoje kiam la fabrikleĝo limigas la infanlaboron en ĝis nun netuŝitaj industribranĉoj al 6 horoj, ĉiam denove aŭdiĝas la lamentado de la fabrikistoj: ke parto de la gepatroj nun elprenas la infanojn el la leĝe reguligita industrio, por vendi ilin al tiuj, kie regas ankoraŭ „libereco de la laboro”, do kie infanoj sub 13 jaroj estas devigataj labori kiel plenkreskuloj, kaj do vendiĝas pli multekoste. Sed ĉar la kapitalo estas laŭnature samniveligisto, do postulas en ĉiuj produktadaj branĉoj samajn ekspluatkondiĉojn de la laboro kiel sian ennaskitan homrajton, la leĝa limigo de infanlaboro en iu industribranĉo kaŭzas ĝian limigon en la alia.

Jam antaŭe ni menciis la korpan degeneron de la infanoj kaj junuloj, kiel de la virinoj de la laboristoj, kiujn la maŝinsistemo submetas al la ekspluatado de la kapitalo unue rekte en la fabrikoj sur maŝina bazo kaj poste malrekte en ĉiuj ceteraj industribranĉoj. Ĉi tie ni do insistas nur pri unu punkto, la eksterordinara mortiĝo de laboristinfanoj en iliaj unuaj vivojaroj. En Anglio ekzistas dek ses distriktoj de registrado, kie en jara mezumo el 100.000 vivantaj infanoj malpli aĝaj ol unu jaro okazas nur 9.085 mortoj (en iu distrikto nur 7.047), en 24 distriktoj pli ol 10.000, sed sub 11.000, en 39 distriktoj pli ol 11.000, sed sub 12.000, en 48 distriktoj pli ol 12.000, sed sub 13.000, en 22 distriktoj pli ol 20.000, en 25 distriktoj pli ol 21.000, en 17 pli ol 22.000, en 11 pli ol 23.000, en *Hoo, Wolverhampton, Ashton-under-Lyne* kaj *Preston* pli ol 24.000, en *Nottingham, Stockport* kaj *Bradford* pli ol 25.000, en *Wisbeach* 26.001 kaj en Manĉestro 26.125.[153] Kiel oficiala kuracista esplorado en la jaro 1861 pruvis, la altaj mortokvotoj, aparte de lokaj cirkonstancoj, okazis precipe pro eksterhejma okupiĝo de la patrinoj kaj pro la de ĝi kaŭzata neglekto kaj mistrakto de la infanoj, interalie pro maltaŭga nutraĵo, manko de nutraĵo, kelkfoje pro trankviligo per narkotaĵoj ktp, aldone al la kontraŭnatura[154] fremdigo de la patrinoj al iliaj infanoj, sekve al intenca mortigo per malsato kaj venenigo.[155] En tiaj kampkulturaj distriktoj, *„kie ekzistas malplej da ina dungiteco, la mortkvoto estas, male, la plej*

153„*Sixth Report on Public Health*”, Londono, 1864, p. 34.

154*En la 3-a kaj 4-a eldono*, anstataŭ „kontraŭnatura”: natura.

155„Ĝi (la esplorado de 1861) … montris krome, ke, dum en la priskribitaj cirkonstancoj la suĉinfanoj pereas pro neglekto kaj mistrakto, kaŭzitaj de la laboro de iliaj patrinoj, la patrinoj perdas en terura dimensio la naturajn emociojn rilate siajn idojn – kutime ties morto ne tre ĉagrenas ilin, kaj kelkfoje … ili faras rektajn disponojn por certigi ĝin.” (saml.)

*malalta"*.[156] Sed la enketkomisiono de 1861 donis la neatenditan rezulton, ke en kelkaj pure kampkulturaj distriktoj situantaj ĉe la Norda Maro la mortokvoto de infantoj malpli ol unujaraĝaj atingis preskaŭ la plej fifamajn fabrikdistriktojn. D-ro Julian Hunter estis pro tio taskita esplori tiun fenomenon surloke. Lia raporto estas enigita en la *„VI. Report on Public Health*"[157] Ĝis tiam oni supozis, ke malario kaj aliaj malsanoj propraj al malaltaj kaj marĉaj regionoj mortigas la infanojn. La esplorado rezultigis la precizan malon, nome,

> „ke la sama kaŭzo, kiu forigis la malarion, nome la transformado de la grundo el marĉo dum vintro kaj malfekunda paŝtejo en somero al fekundaj grenkampoj, kreis la eksterordinaran mortokvoton de la suĉuloj".[158]

La sepdek kuracistaj praktikuloj, kiujn d-ro Hunter en tiuj distriktoj pridemandis, estis „mirige unuanimaj" pri tiu punkto. Ĉar kun la revolucio de la grundkulturo oni enkondukis la industrian sistemon.

> „Edziniĝintaj virinoj, kiuj laboras en bandoj kune kun knabinoj kaj knaboj, estas de viro, kiu nomiĝas „bandestro" kaj dungas la bandojn entute, disponigitaj por certa sumo, Tiuj bandoj migras ofte multajn mejlojn for de siaj vilaĝoj, oni renkontas ilin matene kaj vespere sur la publikaj vojoj, la virinoj vestitaj per mallongaj subjupoj kaj same tiaj jupoj kaj botoj kaj kelkfoje per pantalonoj, aspektaj mirinde fortikaj kaj sanaj, sed koruptitaj de kutima senmoraleco kaj fajfantaj pri la fatalaj sekvoj kiujn ilia prefero de tiu aktiva kaj nomada vivmaniero havas por iliaj idoj, kiuj restas solaj hejme kaj tie pereas."[159]

Ĉiuj fenomenoj observataj en la fabrikdistriktoj reproduktiĝas ĉi tie, en eĉ pli alta grado, interalie kaŝita infanmurdo kaj pritraktado de la infanoj per opiaĵoj.[160]

„Mia kono de la malbonaĵoj kreataj de ĝi", diras d-ro Simon, la kuracista

156 Saml., p. 454.

157 Saml., p. 454-462. *„Reports by Dr. Henry Julian Hunter on the excessive mortality of infants in some rural districts of England."*

158 Saml., p. 35 kaj p. 455, 456.

159 Saml., p. 456.

160 Kiel en la anglaj industridistriktoj, ankaŭ en la kampkulturaj distriktoj la konsumo de opiaĵoj etendiĝas ĉiutage inter la plenkreskaj gelaboristoj. „Antaŭenigi la vendon de opiaĵoj … estas la granda celo de kelkaj entreprenemaj pograndaj komercistoj. Drogkomercistoj konsideras ilin kiel la plej vendatan artiklon." (Saml., p. 459) Suĉuloj, kiuj ricevis opiaĵojn, „ŝrumpis al etaj maljunuletoj aŭ misŝrumpis al simietoj". (Saml., p. 460) Oni vidas, kiel Ĉinio kaj Hindio venĝas sin kontraŭ Anglio.

> oficisto de la angla *Privy-Council* kaj ĉefredaktisto de la raportoj pri „Publika Sano", „devas senkulpigi mian profundan abomenon per kiu mi vidas ĉian ampleksan okupiĝon de plenkreskaj virinoj."[161] La fabrikinspektisto R. Baker elkrias en oficiala raporto, ke „efektive estos feliĉo por la manufakturaj distriktoj de Anglio, se oni malpermesas al ĉia edziĝinta virino, kiu havas familion, labori en ia ajn fabriko."[162]

La morala koruptiĝo, kiu sekvas el la kapitalisma ekspluatado de virino- kaj de infan-laboro, estas prezentita de Frederiko Engelso en sia „Situacio de la laboranta klaso de Anglio" kaj de aliaj verkistoj tiom detale, ke mi ĉi tie nur mencias tiun temon. Sed la intelekta malpleno, artefarite produktita per la transformado de nematuraj homoj al nuraj maŝinoj por fabrikado de plusvaloro kaj nepre distingenda disde la natura nescio kiu lasas la spiriton neokupita sen detrui ĝian evolukapablon, eĉ ĝian naturan fekundecon, devigis fine eĉ la anglan parlamenton, en ĉiuj industrioj submetitaj al la fabrikleĝo, fari la bazan instruadon deviga kondiĉo por „produktive" uzi infanojn malpli ol 14-jaraĝajn. La spirito de la kapitalisma produktado lumis hele el la frivola redaktado de la tiel nomata edukklaŭzoj de la fabrikleĝo, el la manko de ĉia administra inspektado, per kiu tiu deviga instruado fariĝas grandparte iluzia, el la opozicio de la fabrikistoj mem kontraŭ la instruleĝo kaj el iliaj praktikaj trukoj kaj ruzaĵoj por eviti ĝin.

> „Pri tio nur la leĝdonado kritikendas, ĉar ĝi formulis mensogan leĝon kiu, ŝajnigante zorgi por la edukado de la infanoj, entenas eĉ ne unu solan dispozicion per kiu tiu pretendita celo certigeblas. Ĝi determinas nenion, krom ke la infanoj devas esti enfermitaj por certa hornombro" (tri horojn) „tage ene de la kvar vandoj de loko nomata lernejo kaj ke la dungisto de la infano devas pri tio ricevi ĉiusemajne ateston de persono kiu subskribas ĝin kiel lerneja instruisto aŭ lerneja instruistino per sia nomo."[163]

Antaŭ la promulgo de la amendita fabrikleĝo de 1844 ne maloftis ke atestoj pri frekventado de lernejo estis subskribitaj de la instruisto aŭ de la instruistino per kruco, ĉar tiuj mem ne sciis skribi.

> „Dum la vizito, kiun mi faris al lernejo kiu donis tiajn atestojn, mi estis tiom konsternita de la nescio de la instruisto, ke mi diris al li: «Bonvolu, sinjoro, ĉu vi scias legi?» Lia respondo estis: «Jee, imete». Por pravigi sin, li aldonis: «Ĉiukaze mi antaŭas miajn lernejanojn.»"

161 Saml., p. 37.

162 „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1862*", p. 59. Tiu fabrikinspektisto estis antaŭe kuracisto.

163 Leonard Horner en „*Reports of Insp. of Fact. for 30th April 1857*", p. 17.

Dum la preparo de la leĝo de 1844 la fabrikinspektistoj denuncis la hontindan staton de la lokoj nomitaj lernejoj, kies atestojn ili devis agnoski kiel plene laŭleĝajn. Ĉio, kion ili trudis, estis ke ekde 1844

„la nombroj en la lerneja atesto devas esti skribitaj en la manskribo de la instruisto, same lia antaŭnomo kaj familia nomo devas esti subskribitaj de li mem”.[164]

Sir John Kincaid, fabrikinspektisto por Skotlando, rakontas pri similaj samspecaj spertoj.

„La unua lernejo, kiun ni vizitis, estis tenata de s-ino Ann Killin. Laŭ mia peto literumi sian nomon, ŝi tuj faris eraron komencante per la litero C, sed korektis sin tuj dirante, ke ŝia nomo komenciĝas per K. Sed vidante ŝian subskribon en la libroj de lernejaj atestoj mi rimarkis ke ŝi diverse literumis ĝin, dum ŝia manskribo ne lasis dubon pri ŝia nekapablo lerni. Ŝi ankaŭ koncedis mem ke ŝi ne kapablas teni la registron … En dua lernejo mi trovis ke la lerneja ĉambro havas 15 piedojn da longo kaj 10 piedojn da larĝo kaj nombris en tiu ĉambro 75 infanojn, kiuj pepadis ion nekompreneblan.”[165] „Sed estas ne nur tiaj mizeraj kavernoj, en kiuj la infanoj ricevas lernejajn atestojn, sed nenian valoran instruon, ĉar en multaj lernejoj, kie la instruisto estas kompetenta, liaj klopodoj fiaskas preskaŭ tute ĉe la kapturniga amaso da ĉiuaĝaj infanoj, ekde trijaraj. Lia kompensaĵo, en la plej bona kazo mizera, dependas tute de la nombro da pencoj, kiujn li ricevas de la plej granda nombro da infanoj premeblaj en unu ĉambron. Aldoniĝas la mizera meblaro, manko de libroj kaj de alia lernmaterialo kaj la deprima efiko de sufoka, fiodora aero sur la kompatindaj infanoj mem. Mi estis en multaj tiaj lernejoj, kie mi vidis tutajn vicojn da infanoj, kiuj faris absolute nenion; kaj tio estas atestata kiel frekventado de lernejo, kaj tiaj infanoj aperas en la oficialaj statistikoj kiel edukitaj (*educated*).”[166]

En Skotlando la fabrikestroj provas kiom eble ekskludi infanojn subigitajn al la devo frekventi lernejon.

„Tio sufiĉas por pruvi la grandan malfavoron de la fabrikistoj kontraŭ la edukoklaŭzoj.”[167]

Ĉio ĉi fariĝas groteska teruro en la presejoj de kotono kaj de lano ktp, kiuj estas reguligataj de propra fabrikleĝo. Laŭ la dispozicioj de tiu leĝo

„ĉiu infano devas, antaŭ ol esti dungita en tia presejo, esti frekventinta

164 En „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1855*”, p. 18, 19.

165 Sir John Kincaid in „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1858*”, p. 31, 32.

166 Leonard Horner en „*Reports etc. for 30th Apr. 1857*”, p. 17, 18.

167 Sir J. Kincaid [en] „*Rep. Insp. Fact. 31st Oct. 1856*”, p. 66.

> lernejon dum almenaŭ tridek tagoj kaj ne malpli ol cent kvindek horojn dum la ses monatoj rekte antaŭ la unua tago de sia laboro. Dum la daŭro de sia laboro en la presejo ĝi devas frekventi lernejon ankaŭ por periodo de tridek tagoj kaj cent kvindek horoj dum ĉiu sinsekva periodo de ses monatoj. … La frekventado de lernejo devas okazi inter la 8-a horo matene kaj la 6-a horo posttagmeze. Neniu lerneja ĉeesto de malpli ol 2 horoj kaj duono aŭ pli ol kvin horoj en la sama tago kalkuleblas kiel parto de la 150 horoj. En normalaj cirkonstancoj la infanoj frekventas la lernejon antaŭtagmeze kaj posttagmeze dum tridek tagoj, kvin horojn tage, kaj post tiuj tridek tagoj, kiam la laŭstatuta totala sumo de 150 horoj estas atingita, kiam ili, por paroli en ilia propra lingvo, finis sian libron, ili revenas al la presejo, kie ili ree restos ses monatojn, ĝis kiam nova lerneja periodo komenciĝas, kaj tiam ili restas ree en la lernejo, ĝis kiam la libro estas ree finita … Tre multaj knaboj, kiuj frekventas la lernejon dum la preskribitaj 150 horoj, estas ĉe ilia reveno el la sesmonata laborado en la presejo tute same kiel komence. … Ili kompreneble ĉion perdis kion ili estis gajnintaj dum sia antaŭa frekventado de la lernejo. En aliaj kotonpresejoj oni dependigas la frekventadon de la lernejo tute de la komercaj bezonoj de la fabriko. Oni plenigas la necesan nombron da horoj dum ĉiu sesmonata periodo per „partopagoj” de tri ĝis kvin horoj samtempe, kiuj estas dissemitaj tra eble ses monatoj. Ekzemple, je iu tago la lernejo estas frekventata de la 8-a ĝis la 11-a horo matene, je alia tago de la 1-a ĝis la 4-a posttagmeze, kaj post kiam la infano restis serion da tagoj for, ĝi subite revenas de la 3-a ĝis la 6-a posttagmeze; poste ĝi aperas eble por tri aŭ kvar tagoj sinsekve, aŭ por semajno, kaj poste ree malaperas por tri semajnoj aŭ tuta monato kaj revenas por kelkaj ne utilaj tagoj aŭ kelkaj ne utilaj horoj, kiam ĝiaj dungistoj hazarde ne bezonas ĝin; kaj tiel la infano estas puŝata alen kaj reen (*buffeted*) de la lernejo al la fabriko, de la fabriko en la lernejon, ĝis kiam la sumo de la 150 horoj estas plenumita.”[168]

Per enpreno de dominanta nombro da infanoj kaj virinoj en la kombinitan laborpersonaron, la maŝinsistemo fine rompas la rezistadon, kiun la vira laboristo en la manufakturo ankoraŭ kontraŭmetis al la despoteco de la kapitalo.[169]

168 A. Redgrave en „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1857*”, p. 41-43. En la anglaj industribranĉoj, kie la propradira fabrikleĝo (ne la en la teksto laste menciita Preslabora Leĝo (*Print Work's Act*) validas jam de pli longa tempo, la malhelpoj kontraŭ la edukklaŭzoj estis en la lastaj jaroj iom superitaj. En la industrioj ne submetitaj al la fabrikleĝo ankoraŭ tre regas la opinioj de la vitrofabrikisto J. Geddes, kiu esprimis antaŭ la enketkomisaro White: „Kiom mi povas vidi, la pli granda kvanto da edukado, kiun parto de la laborista klaso ĝuis dum la lastaj jaroj, estas malbonaĵo. Ĝi estas danĝera, ĉar ĝi igas ilin sendependaj.” („*Children's Empl. Comm., Fourth Report*”, Londono, 1865, p. 253)

169 „S-ro E., fabrikisto, informis min, ke li dungas ekskluzive virinojn ĉe siaj meĥanikaj teksejoj; li preferas edziniĝintajn virinojn, precipe tiajn kun familio

## *b) Longigo de la labortago*

Se la maŝinsistemo estas la plej potenca rimedo por altigi la produktivon de la laboro, t.e. mallongigi la labortempon necesan por produktado de varo, ĝi fariĝas, kiel portanto de la kapitalo unue en la tuj de ĝi akaparitaj industrioj, la plej potenca rimedo por longigi la labortagon trans ĉian naturan limon. Ĝi kreas unuflanke novajn kondiĉojn kiuj kapabligas la kapitalon libere sekvi tiun ĉi sian tendencon, aliflanke ĝi kreas novajn motivojn por akrigi sian malsategon je fremda laboro.

Unue en la maŝinsistemo la moviĝo kaj la agado de la laborrimedo memstariĝas fronte al la laboristo. Ĝi fariĝas per si mem industria *perpetuum mobile*, kiu plu produktus senfine, se ĝi ne renkontus certajn naturajn limojn en siaj homaj helpantoj: ilian korpan malfortecon kaj ilian volforton. Kiel kapitalo – kaj kiel tia la aŭtomato posedas en la kapitalisto konscion kaj volon – ĝi estas do dotita per la instinkto redukti la rezistantan, sed elastan homan naturlimon al la minimuma rezisto.[170] Tiu estas jam sen tio malgrandigita per la ŝajna facileco de la laboro ĉe la maŝino kaj per la pli obeema kaj fleksebla elemento de virinoj kaj infanoj.[171]

---

hejme, kiu dependas de ili por sia vivtenado; ili estas multe pli atentemaj kaj lernemaj ol ne edziniĝintaj kaj devigataj al ekstrema streĉado de siaj fortoj por akiri la necesajn vivrimedojn. Tiel la virtoj, la virtoj propraj al la virina karaktero, estas pervertitaj al ŝia malutilo – tiel ĉio morala kaj tenera de ŝia naturo estas farata instrumento de ŝia sklaveco kaj de ŝia sufero.” („*Ten Hour's Factory Bill. The Speach of Lord Ashley, 15th March*”, Londono, 1844, p. 20)

170 „Ekde la ĝenerala enkonduko de multekostaj maŝinoj la homa naturo estas streĉita multe trans ĝia mezuma forto.” (Robert Owen: „*Observations on the Effects of the Manufacturing System*”, 2-a eld., Londono, 1817)

171 La angloj, kiuj emas konsideri la plej unuan empirian aperformon de fenomeno kiel ĝian kaŭzon, ofte indikas la grandan herodecan infanrabadon, kiun la kapitalo en la komencoj de la fabriksistemo faris al la malriĉulejoj kaj orfejoj kaj per kio ĝi enkorpigis al si tutan senvolan hommaterialon, kiel kaŭzon de la longa labortempo en la fabrikoj. Ekz-e Fielden, mem angla fabrikestro: „Estas klare, ke la longa labortempo devenas el la cirkonstanco ke oni ricevis tiom grandan nombron da forlasitaj infanoj el diversaj partoj de la lando, tiel ke la fabrikmastroj estis sendependaj de la laboristoj kaj ke ili, post kiam ili jam kutimis la longan labortempon helpe de tiel akirita kompatinda hommaterialo, povis des pli facile trudi ĝin ankaŭ al iliaj najbaroj.” (J. Fielden: „*The Curse of the Factory System*”, London, 1836, p. 11) Koncerne virinlaboron la fabrikinspektisto Saunders diras en la fabrikraporto de 1844: „Inter la laboristinoj estas virinoj, kiuj estas okupataj dum multaj semajnoj sinsekve, kun nur

La produktivo de la maŝinso estas, kiel ni vidis, en inversa proporcio al la grando de la valorparto kiun ĝi transdonas al la produkto. Ju pli longas la periodo, dum kiu ĝi funkcias, des pli grandas la produktokvanto tra kiu distribuiĝas la valoro kiun ĝi aldonas al la unuopa varo. Sed la aktiva viv-periodo de la maŝino estas evidente determinita de la longo de la labor-tago aŭ de la daŭro de la ĉiutaga laborprocezo, obligite per la nombro da tagoj en kiu ĝi ripetiĝas.

La eluziĝo de la maŝino tute ne kongruas kun matematika precizeco kun la tempo de ĝia uzado. Kaj eĉ supozite tion, maŝino, kiu servas dum sep jaroj kaj duono 16 horojn tage, agas en same granda periodo de produktado kaj aldonas al la totala produkto ne pli da valoro ol la sama maŝino kiu dum 15 jaroj servas nur 8 horojn tage. Sed en la unua kazo la maŝinvaloro estus duoble rapide reproduktita ol en la lasta, kaj la kapital-isto englutus pere de ĝi tiom da pluslaboro en sep jaroj kaj duono ol alie en dek kvin.

La materiala eluziĝo de la maŝino estas duobla. La unua estas kaŭzita de ĝia uzado, kiel moneroj eluziĝas per cirkulado, la alia de ĝia neuzado, kiel neuzata spado rustas en la spadingo. En tiu ĉi lasta okazo ili estas konsumataj de la elementoj. La eluziĝo de la unua speco estas pli aŭ malpli en rekta proporcio, la lasta certagrade en inversa proporcio al ilia uzado.[172]

Sed la maŝino estas submetita ne nur al materiala, sed ankaŭ al, por tiel diri, morala eluziĝo. Ĝi perdas interŝanĝvaloron laŭ la mezuro en kiu maŝinoj de sama konstruo reprodukteblas pli malmultekoste aŭ pli bonaj maŝinoj ekkonkurencas ĝin.[173] En ambaŭ kazoj ilia valoro, kiom ajn junaj kaj vivfortaj ili alie povas esti, jam ne estas determinata de la labortempo fakte konkretigita en ĝi mem, sed de la labortempo necesa por ĝia propra reproduktado aŭ por la reproduktado de pli bona maŝino. Ĝi estas do pli aŭ malpli senvalorigita. Ju pli mallonga la periodo, dum kiu ĝia tuta

malmultaj tagoj da escepto, de la 6-a matene ĝis la 12-a nokte, kun malpli ol du horoj por manĝoj, tiel ke restas al ili por kvin tagoj en la semajno el la 24 tagaj horoj nur ses por iri de kaj al la hejmo kaj ripozi en la lito.”

172 „La kaŭzo … de difektiĝo de la delikataj moveblaj partoj de la metala meĥan-ismo povas esti en ilia neagado.” (Ure, l.c., vol. 2, p. 8)

173 La jam antaŭe menciita „manĉestra ŝpinisto” (*Times*, 26-a de novembro 1862) nombras inter la kostoj de maŝino: „Ĝi (nome la „dekalkulo pro eluziĝo de la maŝino”) havas ankaŭ la celon kovri la perdon kiu estiĝas konstante per tio ke maŝinoj, antaŭ ol esti eluzitaj, estas metitaj ekster uzado per aliaj novaj kaj pli bone konstruitaj.”

valoro reproduktiĝas, des malpli grandas la danĝero de morala eluziĝo, kaj ju pli longa la labortago, des malpli longa estas tiu periodo. Ĉe la unua enkonduko de maŝino en iu ajn produktada branĉo sekvas bato post bato novaj metodoj de ilia pli malmultekosta reproduktado[174] kaj plibonigoj kiuj koncernas ne nur izolitajn partojn aŭ aparatojn, sed ĝian tutan konstruadon. En ĝia unua vivperiodo tiu aparta motivo por longigo la labortagon efikas do plej akre.[175]

Sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj kaj ĉe donita labortago la ekspluatado de duobla nombro da laboristoj postulas ankaŭ duobligon de la parto de konstanta kapitalo same kiel de tiu elspezata en krudmaterialo, helpsubstancoj ktp. Kun plilongigita labortago etendiĝas la skalo de produktado, dum la kapitalo elspezita en maŝinoj kaj konstruaĵoj restas senŝanĝa.[176] Do, ne nur la plusvaloro kreskas, sed la elspezoj, necesaj por elekspluati ĝin, malkreskas. Tio ja okazas ankaŭ pli aŭ malpli ĉe ĉia longigo de la labortago, sed ĉi tie ĝi havas pli decidan gravecon, ĉar la parto de la kapitalo transformita en laborrimedojn entute pezas pli.[177] Ĉar la evoluo de la maŝinsistemo ligas ĉiam kreskantan parton de la kapitalo en formo, en kiu ĝi estas unuflanke konstante plivalorigebla, aliflanke perdas uzvaloron kaj interŝanĝvaloron, ekde kiam ĝia kontakto kun la vivanta laboro estas interrompita. „Kiam, instruis s-ro Ashwort, angla kotonmagnato, la profesoron Nassau W. Senior,

174 „Oni taksas ĝenerale, ke konstrui unu solan maŝinon laŭ nova modelo kostas kvinoble pli ol la rekonstruado de la sama maŝino laŭ la sama modelo.” (Babbage, l.c., p. 211, 212)

175 „De kelkaj jaroj oni faris tiom da gravaj kaj multnombraj plibonigoj en la fabrikado de tulo, ke bone konservita maŝino akirita je la kostoprezo de 1.200 sterlingaj pundoj kelkajn jarojn poste vendiĝis je 60 pundoj. … La plibonigoj sinsekvis tiom rapide ke maŝinoj restis nefinitaj en la mano de iliaj konstruistoj, ĉar ili estis per pli bonŝancaj inventoj jam arkaiĝintaj.” (Babbage, saml., p. 233) En tiu periodo de ŝtorma aktiveco la tulfabrikistoj kompreneble longigis la labortempon de ok horoj al dudek kvar horoj dungante la duoblon da laboristoj.

176 „Estas evidente ke kun la fluso kaj malfluso de la merkato kaj la alterna kreskado kaj ŝrumpiĝo de la postulo la okazoj konstante revenas en kiuj la fabrikisto povas uzi kroman cirkulantan kapitalon sen uzi kroman fiksan kapitalon … se kromaj kvantoj da krudmaterialo prilaboreblas sen kromaj elspezoj por konstruaĵoj kaj maŝinoj.” (R. Torrens: „*On Wages and Combination*”, Londono, 1834, p. 64)

177 La cirkonstanco menciita en la teksto aperas ĉi tie nur por ke la nombrado estu kompleta, ĉar mi pritraktos la profitkvoton, do la proporcion de la plusvaloro al la elspezita totala kapitalo, nur en la Tria Libro.

> „kiam kampulo demetas sian fosilon, tiam li senutiligas por tiu periodo kapitalon de 18 pencoj. Se iu el niaspeculoj (li celas la fabriklaboristojn) forlasas la fabrikon, li senutiligas kapitalon kiu kostis 100.000 sterlingajn pundojn."[178]

Nepenseble! Igi kapitalon, kiu kostis 100.000 sterlingajn pundojn, eĉ nur por momento „senutila"! Efektive estas skandalege, ke iu niaspeculo entute iam forlasas la fabrikon! La kreskanta amplekso de la maŝinaro igas, kiel la de Ashworth instruita Senior komprenas, ĉiam kreskantan longigon de la labortago „dezirinda".[179]

La maŝino produktas relativan plusvaloron ne nur per tio ke ĝi rekte malplivalorigas la laborforton kaj tiun malrekte malplikostigas per malplikostigo de la varoj kiuj eniras en ĝian reproduktadon, sed ankaŭ per tio ke ĝi, ĉe sia unua sporada enkonduko transformas la laboron uzatan de la maŝinposedanto en potencigitan laboron, altigas la socian valoron de la maŝinprodukto super ĝian individuan valoron kaj tiel kapabligas la kapitaliston anstataŭigi la tagan valoron de la laborforto per malpli alta valorparto de la taga produkto. Dum tiu transira periodo, dum kiu la maŝinsistemo restas ia monopolo, la profitoj estas do eksterordinaraj, kaj la kapitalisto provas pleje ekspluati tiun „unuan tempon de juna amo" per kiom eble plej granda longigo de la labortago. La grando de la profito akrigas la malsategon je profito.

Kun la ĝeneraliĝo de la maŝinsistemo en la sama produktadbranĉo la socia valoro de la maŝinprodukto falas al sia individua valoro kaj tiel la leĝo ekvalidas, ke la plusvaloro ne devenas el la laborfortoj, kiujn la kapitalisto anstataŭigis per la maŝino, sed inverse el la laborfortoj, kiujn li laborigas ĉe ĝi. La plusvaloro fontas nur el la varia parto de la kapitalo, kaj ni vidis, ke la kvanto de la plusvaloro estas determinata de du faktoroj: la kvoto de la plusvaloro kaj la nombro da samtempe okupataj

---

178 <Ĉe Senior: 100 £.> Senior: „*Letters on the Factory Act*", Londono, 1837, p. 14.

179 „La granda proporcio de la fiksa kompare kun la cirkulanta kapitalo … igas longan labortempon dezirinda." Kun la kreskanta amplekso de la maŝinaro ktp „la motivoj al longaj laborhoroj grandiĝos, ĉar tio estas la sola rimedo profitigi grandan kvanton da fiksa kapitalo". (Saml., p. 11-14) „Ekzistas diversaj elspezoj ĉe fabriko, kiuj restas konstantaj, egale ĉu la fabriko laboras dum pli aŭ malpli da tempo, ekz-e rento por la konstruaĵoj, lokaj kaj ĝeneralaj impostoj, fajroasekuro, salajro por diversaj konstantaj laboristoj. Malboniĝo de la maŝinaro apud diversaj aliaj ŝarĝoj, kies proporcio al la profito malkreskas en la sama proporcio kiel la amplekso de la produktado kreskas." („*Reports of the Insp. of Fact. for 31st Oct. 1862*", p. 19)

laboristoj. Ĉe donita longo de la labortago la kvoto de la plusvaloro estas determinata de la proporcio, en kiu la labortago dividiĝas en necesa laboro kaj pluslaboro. La nombro da samtempe okupataj laboristoj dependas siavice de la proporcio de la varia kapitalo al la konstanta. Estas nun klare, ke la maŝinsistemo, kiom ajn ĝi etendas la pluslaboron per altigo de la produktadforto de la laboro surkoste de la necesa laboro, rezultigas tion nur per malaltigo de la nombro da laboristoj dungitaj de donita kapitalo. Ĝi transformas parton de la kapitalo, kiu estis antaŭe varia, kiu do transformiĝis en vivan laborforton, en maŝinojn, do en konstantan kapitalon, kiu ne produktas plusvaloron. Maleblas ekzemple el du laboristoj elpremi tiom da plusvaloro kiom el dudek kvar. Se ĉiu el la dudek kvar laboristoj liveras el 12 horoj nur unu horon da pluslaboro, ili liveras kune dudek kvar horojn da pluslaboro, dum la entuta laboro de la du laboristoj estas nur dudek kvar horoj. En la uzado de maŝinoj por produktado de plusvaloro kuŝas do imanenta kontraŭdiro,per tio ke ĝi el la du faktoroj de la plusvaloro, kiun kapitalo de donita grando liveras, pligrandigas unu faktoron, la kvoton de la plusvaloro, nur per tio, ke ĝi malgrandigas la alian faktoron, la nombron da laboristoj. Tiu imanenta kontraŭdiro aperas ekde kiam per la ĝeneraliĝo de la maŝinsistemo en iu industribranĉo la valoro de la maŝine produktita varo fariĝas regulanta socia valoro de ĉiuj samspecaj varoj; kaj estas tiu kontraŭdiro, kiu siavice devigas la kapitaliston, sen ke li konscias pri tio,[180] al plej perforta longigo de la labortago, por kompensi la malaltigon de la proporcia nombro de la ekspluatataj laboristoj per pliigo ne nur de la relativa, sed ankaŭ de la absoluta plusvaloro.

Do, se la kapitalisma aplikado de maŝinoj unuflanke kreas novajn motivojn por senmezura longigo de la labortago kaj revoluciigas la labormanieron mem kiel la socian karakteron de la kolektiva laboristo tiel ke ĝi rompas la rezistadon kontraŭ tiu tendenco, ĝi produktas aliflanke, parte per dungado de tavoloj de la laborista klaso antaŭe ne alireblaj por la kapitalo, parte per „liberigo” de laboristoj anstataŭitaj de la maŝino, superfluan loĝantaron de laboristoj[181], kiu devas lasi al si dikti la leĝon de la kapitalo. Pro tio la mirinda fenomeno en la historio de la moderna

---

180 Kial tiu imanenta kontraŭdiro ne venas al la konscio de la individua kapitalisto, kaj ankaŭ ne de la politika ekonomio kiu estas barita de lia vidmaniero, tion oni vidos el la unuaj sekcioj de la Tria Libro.

181 Estas unu el la grandaj meritoj de Ricardo ke li komprenis la maŝinsistemon ne nur kiel rimedon por produktado de varoj, sed ankaŭ de „troabunda loĝantaro” („redundant population”).

industrio, ke la maŝino renversas ĉiajn moralajn kaj naturajn limojn de la labortago. Pro tio la ekonomia paradokso, ke la plej potenca rimedo por mallongigi la labortempon ŝanĝiĝas al la plej senmanka rimedo por transformi la tutan vivtempon de la laboristo kaj de lia familio en disponeblan labortempon por la plivalorigo de la kapitalo. Aristotelo, la plej granda pensisto de la antikva epoko, revis:

> „se ĉia instrumento povus, laŭ ordono, aŭ ankaŭ per propra antaŭsento, plenumi sian propran taskon, kiel la artaĵoj de Dedalo, kiuj moviĝis per si mem, aŭ kiel la tripiedoj de Hefesto iris propriainiciate al la sankta laboro, se tiel la teksilaj navetoj teksus per si mem, tiam la majstro ne bezonus help-antojn nek la mastro sklavojn."[182]

Kaj Antipatro[183], greka poeto el la tempo de Cicerono, salutis la inventon de la akvomuelilo por mueli grenon, tiun elementan formon de ĉia produktanta maŝino, kiel liberigon de la sklavinoj kaj kreanto de la ora epoko![184] „La paganoj, jes, la paganoj!" Ili komprenis, kiel la saĝa Bastiat malkovris, kaj jam antaŭ li la eĉ pli saĝa MacCulloch, neniom pri politika ekonomio kaj kristanismo. Ili interalie ankaŭ ne komprenis, ke la maŝino estas la plej taŭga rimedo por longigo de la labortago. Ili ja senkulpigis la sklavecon de iu kiel rimedon por plena homa disvolviĝo de la alia. Sed prediki sklavecon de la amasoj por fari kelkajn krudajn aŭ duonklerajn parvenuojn „eminentaj ŝpinistoj", „grandaj kolbasfabrikistoj" kaj „influaj cirkomercistoj", por tio mankis al ili la specife kristana organo.

182 F. Biese: *„Die Philosophie des Aristoteles"*, Dua volumo, Berlino, 1842, p. 408.

183 *Originale:* Antipatros. -vl

184 Mi donas ĉi tie la tradukon de la poeziaĵo fare de Stolberg, ĉar ĝi tute same kiel la antaŭaj citaĵoj pri labordivido karakterizas la kontraŭecon de la antikva vidmaniero al la moderna.

> „Domaĝu la muelantan brakon, ho muelistinoj, dormu
> Trankvile! Vane la koko anoncu al vi la matenon!
> Dao ordonis la laboron de la knabinoj al la nimfoj,
> Kaj tiuj nun saltas facile tra la radoj,
> Ke la tremantaj aksoj kun siaj spokoj turniĝu,
> Kaj ronde turnu la ŝarĝon de la ŝtono ruliĝa.
> Ni vivu la vivon de la prapatroj, kaj senlabore ĝuu la
> Donacojn kiujn la diino donas al ni."
> (*„Gedichte aus dem Griechischen übersetzt von Christian Graf zu Stolberg"*,
> Hamburgo, 1782)

## c) Intensigo de la laboro

La senmezura longigo de la labortago, kiun la maŝino produktas en la mano de la kapitalo, alkondukas poste, kiel ni vidis, reagon de la socio minacata en sia vivradiko, kaj kun tio leĝe limigitan norman labortagon. Surbaze de tiu evoluas fenomeno, kiun ni renkontis jam antaŭe, ĝis decida graveco – nome la intensigo de la laboro. La analizo de la absoluta plusvaloro temas unue pri la malintensa grando de la laboro, dum la grado de ĝia intenseco estis supozata kiel donita. Ni konsideru nun la transformiĝon de la malintensa grando en intensan aŭ gradan grandon.

Evidentas, ke kun la progreso de la maŝinsistemo kaj de la akumulita sperto de aparta klaso de maŝinlaboristoj la rapido kaj per tio la intenso de la laboro kreskas sponte. En Anglio ekzemple dum duona jarcento la longigo de la labortago iras brak-en-brake kun la kreskanta intenso de la fabriklaboro.

Tamen klare videblas, ke laboro, tie kie ne temas pri paroksismaj fenomenoj, sed pri ĉiutage ripetiĝanta samformeco, devas nepre atingi punkton, ĉe kiu etendo de la labortago kaj intensigo de la laboro ekskludas sin reciproke, tiel ke etendo de la labortago fariĝas eltenebla nur per malpliigo de la laborintenso, kaj inverse pli alta laborintenso nur per malpli longa labortago.

Ekde kiam la iom post iom ŝvelanta ribelemo de la laborista klaso devigis la ŝtaton trudi mallongigon de la labortempo kaj dikti unue al la propradira fabriko norman labortagon, do ekde tiu momento, kiam plia produktado de plusvaloro per longigo de la labortago estis definitive malpermesata, la kapitalo ĵetis sin per sia tuta energio kaj plenkonscie sur la produktado de relativa plusvaloro per pli rapida disvolvado de la maŝinsistemo.

Samtempe okazas ŝanĝo en la karaktero de la relativa plusvaloro. Ĝenerale la metodo produkti relativan plusvaloron konsistas en altigo de la produktivo de la laboro de la laboristo, tiel ke la laboristo kapablas per la sama elspezo de laboro en la sama tempo produkti pli. La sama labortempo aldonas, nun kiel antaŭe, al la tuta produkto la saman valoron, kvankam tiu sama interŝanĝvaloro prezentiĝas nun en pli da uzvaloroj kaj pro tio la valoro de la unuopaj varoj malaltiĝas.

Sed tio ŝanĝiĝas kun la trudita mallongigo de la labortempo. La giganta impulso kiun ĝi donas al la disvolvado de la produktadforto kaj al ŝparado

de kostoj devigas la laboriston ankaŭ samtempe elspezi pli da laboro en la sama tempo, pli streĉi sian laborforton, pli dense plenigi la porojn de la labortempo, do densigi la laboron en grado atingebla nur en mallongigita labortago. Tiu kunpremado de pli granda kvanto da laboro en donitan tempon kalkuliĝas nun kiel tio kio ĝi estas, nome kiel pli granda laborkvanto. Nun oni kalkulas la laborgrandon laŭ du manieroj, laŭ ĝia etendiĝo kaj laŭ la grado de ĝia denseco.[185] La pli intensa horo de la dekhora labortago entenas nun tiom da laboro – aŭ tiom pli da laboro –, do da elspezita laborforto, kiel la pli poreca horo de la dekduhora labortago. Ĝia produkto havas do tiom da – aŭ tiom pli da – valoro kiel tiu de la pli porecaj $1^1/_5$ horoj. Sendepende de la altigo de la relativa plusvaloro per la altigita produktadforto de la laboro, nun ekz-e $3^1/_3$ horoj da pluslaboro liveras por $6^2/_3$ horoj da necesa laboro al la kapitalisto la saman valorkvanton kiel antaŭe 4 horoj da pluslaboro por 8 horoj da necesa laboro.

La demando estas nun, *kiel* la laboro estas intensigata?

La unua efiko de la mallongigita labortago baziĝas sur tiu evidenta leĝo, laŭ kiu la agkapablo de la laborforto estas en inversa proporcio al ĝia agtempo. Tio, kio perdiĝas per malpli da daŭro, estas, en certaj limoj, gajnata per pli da intenso. Sed ke la laboristo apliku ankaŭ vere pli da laborforto, por tio zorgas la kapitalo per la pagmetodo.[186] En manufakturoj, ekz-e potfarado, kie la maŝinsistemo ludas nenian aŭ malgrandan rolon, la enkonduko de la fabrikleĝo klare pruvis, ke nura mallongigo de la labortago mirige altigas la regulecon, samformecon, ordon, kontinuecon kaj energion de la laboro.[187] Sed tiu efiko ŝajnis duba en la propradira fabriko, ĉar la dependeco de la laboristo de la kontinua kaj samforma moviĝo de la maŝino tie jam delonge kreis la plej severan disciplinon. Kiam en la jaro 1844 oni intertraktis pri la malaltigo de la labortago al sub 12 horoj, la fabrikistoj deklaris do preskaŭ unuvoĉe, ke

> „iliaj submastroj en la diversaj laborĉambroj atentas ke iliaj manoj ne perdu tempon", „la grado de zorgemo kaj atento de la laboristoj (*the extent of vigilance and attention on the part of the workmen*) estas apenaŭ pliigeblaj",

185 Kompreneble estas diferencoj en la intenseco de la laboroj de diversaj produktbranĉoj. Tiuj kompensiĝas, kiel jam A. Smith montris, parte per flankaj cirkonstancoj propraj al ĉia speco de laboro. Sed kiel mezuro de la valoro, la labortempo estas tuŝita ankaŭ ĉi tie nur en la okazoj kie la daŭro de la laboro kaj la grado de ĝia intenso estas du kontraŭaj esprimoj por unu sama laborkvanto, kiuj sin reciproke ekskludas.

186 Speciale per la popeca salajro, formo pritraktota en la sesa sekcio.

187 Vd „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1865*".

> kaj ĉar ĉiuj aliaj cirkonstancoj, ekz-e rapido de la maŝinaro ktp restas senŝanĝaj, „estas do absurde atendi en bone gvidataj fabrikoj de altigita atento ktp de la laboristoj ian ajn gravan rezulton".[188]

Tiu aserto estis refutita de eksperimentoj. S-ro R. Gardner laborigis en siaj du grandaj fabrikoj en *Preston* de la 20-a de aprilo 1844 anstataŭ 12 jam nur 11 horojn tage. Post proksimume jaro rezultiĝis, ke

> „oni ricevis la saman kvanton da produkto, kaj ĉiuj laboristoj perlaboris en 11 horoj same multan salajron kiel antaŭe en 12".[189]

Mi ne mencias ĉi tie la eksperimentojn en la ĉambroj de ŝpinado kaj kardado, ĉar tie oni altigis la rapidon de la maŝinaro (je 2 %). Sed en la departemento de teksado, kie oni krome teksis diversajn specojn de malpezaj, figurecaj fantazi-artikloj, tute ne okazis ŝanĝoj en la objektivaj produktadkondiĉoj. La rezulto estis:

> „De la 6-a de januaro ĝis la 20-a de aprilo 1844, kun dekduhora labortago, semajna mezuma salajro de ĉiu laboristo 10 ŝilingoj 1$^{1}/_{2}$ pencoj, de la 20-a de aprilo ĝis la 29-a de junio 1844, kun dekunuhora labortago, semajna mezuma salajro 10 ŝilingoj 3$^{1}/_{2}$ pencoj."[190]

Tie oni produktis dum 11 horoj pli ol antaŭe dum 12, ekskluzive pro pli granda pli samforma aktiveco de la laboristoj kaj ŝparado de ilia tempo. Dum ili ricevis la saman salajron kaj gajnis unu horon da libera tempo, la kapitalisto ricevis la saman kvanton da produktoj kaj ŝparis elspezon de karbo, gaso ktp por unu horo. Similaj eksperimentoj estis faritaj kun la sama sukceso en la fabrikoj de la s-roj Horrocks kaj Jacson.[191]

Ekde kiam la mallongigo de la labortago, kiu kreas unue la subjektivan kondiĉon de la densigo de la laboro, nome la kapablon de la laboristo elspezi pli da forto en donita tempo, fariĝas leĝe deviga, la maŝino fariĝas en la mano de la kapitalisto la objektiva kaj sisteme aplikata rimedo por elpremi pli da laboro en la sama tempo. Tio okazas en duobla maniero:

188 „*Reports of Insp. of Fact. for 1844 and the quarter ending 30th April 1845*", p. 20, 21.

189 l.c., p. 19. Ĉar la popeca salajro restis la sama, la alteco de la semajna salajro dependis de la kvanto de produkto.

190 Saml., p. 20.

191 Saml., p. 21. La morala elemento ludis gravan rolon en la supre menciitaj eksperimentoj. „Ni", klarigis la laboristoj al la fabrikinspektisto, „laboras pli vigle, ni pensas konstante pri la salajro, pri foriri vespere pli frue, kaj agema kaj ĝoja spirito trablovas la tutan fabrikon, de la plej juna ĝis la plej maljuna laboristo, kaj ni povas multe helpi unu la alian ĉe la laboro." (saml.)

per altigita rapido de la maŝinoj kaj per pli granda amplekso de la maŝinaro kontrolenda de la laboristo aŭ de lia laborkampo. Plibonigita konstruado de la maŝinoj necesas por pli granda premo sur la laboristo, parte ĝi akompanas per si mem la intensigon de la laboro, ĉar la limo de la labortago devigas la kapitaliston plej strikte ŝpari kostojn de produktado.

La plibonigo de la vapormaŝino altigas la nombron da ĝiaj piŝtobatoj en unu minuto kaj samtempe ebligas, per pli granda ŝparo de fortoj, movi pli ampleksan meĥanismon per la sama motoro, ĉe senŝanĝa aŭ eĉ malpli alta konsumo de karbo. La plibonigo de la transmisia meĥanismo malpliigas la frotiĝon kaj, kio okulfrape distingas la modernan maŝinaron disde la pli malnova, ĝi reduktas diametron kaj pezon de la grandaj kaj malgrandaj ŝaftoj al ĉiam pli malgranda minimumo. La plibonigoj de la labormaŝino fine malgrandigas, ĉe pli alta rapido kaj pli granda efikeco, ĝian amplekson, ekzemple ĉe la moderna vaporteksilo, aŭ pligrandigas kun la korpo amplekson kaj nombron da ĝiaj laboriloj, ekz-e ĉe la ŝpinmaŝino, aŭ pliigas la moviĝon de tiuj iloj per apenaŭ rimarkeblaj detalŝanĝoj, kiel oni ekz-e altigis ĉe la aŭtomata ŝpinmaŝino meze de la 1850-aj jaroj la rapidon de la ŝpiniloj je kvinono.

La mallongigo de la labortago al 12 horoj okazis en Anglio en 1832. Jam en 1836 angla fabrikisto deklaris:

> „Kompare kun antaŭe, la laboro farenda en la fabrikoj tre kreskis, pro la pli granda atento kaj agado, kiun la konsiderinde pli granda rapido de la maŝinaro postulas de la laboristo.”[192]

En la jaro 1844 Lord Ashley, la nuna grafo Shaftesbury, sciigis en sia parolado pri la dekhora leĝo en la Ĉambro de Deputitoj jenajn faktojn:

> „La laboro de la dungitoj en la fabrikprocezoj estas nun trioble pli granda ol dum la enkonduko de tiaj operacioj. La maŝinsistemo plenumis sendube taskon kiu anstataŭas la tendenojn kaj muskolojn de milionoj da homoj, sed ĝi ankaŭ mirinde (*prodigiously*) pliigis la laborojn de la homoj dominataj de ĝia terura moviĝo … En la jaro 1815, la laboro sekvi du ŝpinmaŝinojn de kotono n-ro 40 dum 12 horoj de unu al la alia inkludis trakuron de distanco de 8 mejloj. En la jaro 1832 la distanco trairenda por sekvi du ŝpinmaŝinojn kiuj ŝpinis kotonon de la sama numero, estis 20 mejloj, kaj ofte pli.[193] En 1825 la

192 John Fielden, l.c., p. 32.

193 La ŝpinmaŝinoj, kiujn la laboristo devas sekvi, antaŭiĝas kaj revenas alterne; kiam ili antaŭiĝas, la fadenfasketoj estas eltirataj al longigitaj fadenoj. La ligisto devas kapti la momenton kiam la ĉareto estas proksima al la sistemframo por religi la rompitajn fadenojn aŭ rompi la malbone ŝpinitajn. La kalkuloj cititaj de Lord Ashley estis faritaj de matematikisto kiun li estis por

ŝpinisto devis en 12 horoj fari 820 eltirojn ĉe ĉiu ŝpinmaŝino, kio estis entuta sumo de 1.640 por 12 horoj. En la jaro 1832 la ŝpinisto devis dum sia dekduhora labortago fari ĉe ĉiu ŝpinmaŝino 2.200 eltirojn, kune 4.400, en la jaro 1844 ĉe ĉiu ŝpinmaŝino 2.400, entute 4.800: kaj en kelkaj okazoj la postulata laborkvanto (*amount of labour*) estas ankoraŭ pli granda. Por taksi la lacigon de labortago, necesas ankaŭ konsideri la neceson turni kvar- aŭ kvin-mil foje la korpon en kontraŭan direkton[194] kaj la konstantajn fortostreĉojn de klini kaj rektigi la korpon.[195] … Mi havas ĉi tie enmane alian dokumenton de 1842, en kiu estas pruvite, ke la laboro kreskas progrese, ne nur, ĉar pli granda distanco trairendas, sed ĉar la kvanto da produktataj varoj pliiĝas, dum la nombro da manoj proporcie malpliiĝas; kaj krome, ĉar nun ofte ŝpiniĝas pli malbona kotono, kiu postulas pli da laboro … En la kardejo okazis ankaŭ granda pliiĝo de laboro. Unu homo faras nun la laboron kiu estis antaŭe dividita inter du … En teksejo, kie laboras granda nombro da homoj, plej ofte inaj, la laboro dum la lastaj jaroj kreskis je plenaj 10 %, pro la pli granda rapido de la maŝinaro. En la jaro 1838 la nombro de la ĉiusemajne ŝpinataj fadenvolvaĵoj estis 18.000, en la jaro 1843 ĝi estis 21.000. En la jaro 1819 la nombro da veftoĵetoj (picks) de la vaporteksilo estis 60 minute, en la jaro 1842 ĝi estis 140, kio indikas grandan kreskon de laboro."[196]

Vide al tiu rimarkinda intenso kiun la laboro atingis jam en 1844 sub la regado de la dekduhor-leĝo, la deklaro de la anglaj fabrikistoj ŝajnis tiam prava, ke ĉia plia progreso en tiu direkto estus neebla, kaj pro tio ĉia plia malpliigo de la labortempo estus identa kun malpliigo de la produktado. La ŝajna ĝusteco de ilia argumento estis pruvita de samtempa atesto kiun faris ilia senlaca kontrolisto, la fabrikinspektisto Leonard Horner:

„Ĉar la produktata kvanto estas reguligata ĉefe de la rapido de la maŝinoj, la intereso de la fabrikisto devas esti igi ĝin moviĝi je la kiom eble plej granda rapido kongruebla kun jenaj kondiĉoj: ŝirmado de la maŝinaro kontraŭ tro rapida pereo, konservado de la kvalito de la fabrikata artiklo kaj kapablo de la laboristo sekvi la movon sen pli granda fortostreĉo ol li povas fari kontinue. Okazas ofte, ke la fabrikisto en sia hasto tro rapidigas la maŝinaron. Rompoj kaj malbonkvalita produkto tiam pli ol kompensas la rapidon, kaj li estas devigata moderigi la rapidon de la maŝinoj. Ĉar aktiva kaj komprenema fabrikisto eltrovas la atingeblan maksimumon, mi konkludis, ke maleblas produkti en 11 horoj tiom kiom en 12. Mi krome supozis, ke la laboristo pagata laŭpece streĉas siajn fortojn plej ekstreme tiom kiom li povas kontinue

---

tio sendinta al Manĉestro. [franca eld.]

194 Temas pri ŝpinisto kiu laboras samtempe ĉe du vid-al-vidaj ŝpinmaŝinoj. [franca eld.]

195 La lasta frazo el la franca eld. -vl

196 Lord Ashley, l.c., p. 6-9 divl.

elteni la saman gradon de laboro."[197]

Horner konkludis do, malgraŭ la eksperimentoj de Gardner ktp, ke plia mallongigo de la labortago sub 12 horojn devas malaltigi la kvanton de la produkto.[198] Li mem citas dek jarojn poste sian rezervon de 1845 kiel pruvon, kiom malmulte li tiam komprenis la elastecon de la maŝinaro kaj de la homa laborforto, kiuj ambaŭ estis per la deviga mallongigo de la labortago ekstreme streĉitaj.

Ni venu nun al la periodo post 1847, ekde la enkonduko de la dekhorleĝo en la angla koton-, lan-, sild- kaj lin-fabrikoj.

> „La rapido de la ŝpiniloj kreskis ĉe la *throstles* al 500, ĉe la aŭtomataj ŝpinmaŝinoj al 1.000 turniĝoj minute, tio signifas ke la rapido de la *throstle*-ŝpinilo, kiu 1839 faris 4.500 turniĝojn en la minuto, faras nun (1862) 5.000, kaj tiu de la aŭtomata ŝpinmaŝino, kiu faris 5.000, faras nun 6.000 en la minuto; tio estas en la unua kazo dekono kaj en la dua sesono[199] da kroma rapido."[200]

James Nasmyth, la fama civila inĝeniero de *Patricroft*, apud Manĉestro, klarigis 1852 en letero al Leonard Horner la plibonigojn de la vapormaŝino faritajn de 1848 ĝis 1852. Post rimarkigi, ke la vaporĉevalpovo, en la oficiala fabrikstatistiko konstante taksata laŭ sia efiko en la jaro 1828,[201] estas jam nur nominala kaj ke ĝi povas servi jam nur kiel indikilo de la reala povo, li diras interalie:

> „Estas nenia dubo, ke vapormaŝinoj de sama pezo, ofte la samaj identaj maŝinoj, ĉe kiuj nur la modernaj plibonigoj estas aplikitaj, plenumas mezume kvindek elcentojn pli da faraĵo kaj ke en multaj okazoj la samaj identaj vapormaŝinoj, kiuj en la tempo de limigita rapido de 220 futoj minute liveris 50 ĉevalpovojn, liveras hodiaŭ, kun malpli da karbokonsumo, pli ol 100 … La moderna vapormaŝino kun la sama nominala ĉevalpovo kiel antaŭe havas pli

197 „*Reports of Insp. of Fact. to 30th April 1845*", p. 20.

198 Saml., p. 22.

199 En la 1-a ĝis 4-a eldono: kvinono.

200 „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1862*", p. 62.

201 Tio ŝanĝiĝis kun la „*Parliamentary Return*" (statistiko) de 1862. Tie la vera vaporĉevalpovo de la modernaj vapormaŝinoj kaj akvoradoj anstataŭas la nominalan povon (vd p. 99, n. 133). La ŝpiniloj por duobligo ne estas plu konsiderataj kune kun la propradiraj ŝpiniloj (kiel en la „*Returns*" de 1839, 1850 kaj 1856); krome oni aldonis por la lanfabrikoj la nombron da *gigs* (maŝinoj por malglatigo), distingon inter juto- kaj sisal-fabrikoj unuflanke, linfabrikoj aliflanke, kaj fine oni enprenis por la unua fojo la ŝtrumptrikejojn en la raporton.

grandan forton ol antaŭe, pro ĝia plibonigita konstruo, malpli da grandeco kaj pli efika konstruo de siaj kaldronegoj ktp. … Kvankam do la sama nombro da manoj kiel en antaŭaj periodoj estas aplikataj, proporcie al la nominala ĉevalpovo, nun estas malpli da manoj aplikataj proporcie al la labormaŝinoj."[202]

En la jaro 1850 la fabrikistoj de Britio uzis 134.217 nominalajn ĉevalpovojn por movi 25.638.716 ŝpinilojn kaj 301.445 teksilojn. En la jaro 1856 la nombro da ŝpiniloj kaj teksiloj estis respektive 33.503.580 kaj 369.205. Se la necesa ĉevalpovo restintus sama kiel en 1850, tiam necesus en 1856: 175.000 ĉevalpovoj. Sed la oficialaj dokumentoj atestas pri nur 161.435, do pri pli ol dek mil ĉevalpovoj malpli ol se oni kalkulas laŭ la bazo de 1850.[203]

„La faktoj konstatitaj per la lasta oficiala statistiko (*return*) de 1856 estas, ke la fabriksistemo rapidege disvastiĝas, la nombro da manoj proporcie al la maŝinoj malpliiĝis, la vapormaŝino per ŝparo de forto kaj aliaj metodoj movas pli grandan maŝinpezon kaj rezultigas pli grandan kvanton da produktoj, sekve al plibonigitaj labormaŝinoj, ŝanĝitaj metodoj de fabrikado, pli alta rapido de la maŝinaro kaj multaj aliaj kialoj."[204] „La grandaj plibonigoj enkondukitaj en ĉiaj maŝinoj tre altigis ties produktadforton. Sen ajna dubo la mallongigo de la labortago … stimulis tiujn plibonigojn. Tiuj kaj la pli intensa klopodado de la laboristo rezultigas ke almenaŭ same multa produkto liveriĝas en la" (je du horoj aŭ sesono) „mallongigita labortago kiel antaŭe dum la pli longa."[205]

Kiom la riĉiĝo de la fabrikistoj kreskis kun la pli intensa ekspluatado de la laborforto, tion pruvas jam la sola fakto, ke la mezuma kresko de la angla koton- ktp -fabrikoj de 1838 ĝis 1850 jare je 32 elcentoj, sed de 1850 ĝis 1856 jare 86 elcentoj.

Kvankam en la ok jaroj de 1848 ĝis 1856, sub la dekhora labortago, la progreso de la angla industrio estis jam granda, ĝi estis ree ege superita en la sekva sesjara periodo de 1856 ĝis 1862. En la silkfabriko ekz-e en 1856 estis 1.093.799 ŝpiniloj, en 1862: 1.388.544; teksiloj 9.260 kaj en 1862: 10.709. Sed la nombro da laboristoj en 1856 estis 56.137, kaj en 1862: 52.429. Tio signifas kreskon de la nombro da ŝpiniloj de 26,9 elcentoj kaj de la teksiloj de 15,6 elcentoj kun samtempa 7-elcenta malkresko de la

202 *Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1856*", p. 14, 20.
203 Saml., p. 14, 15.
204 Saml., p. 20.
205 „*Reports etc. for 31st Oct. 1858*", p. 10. Kp „*Reports etc. for 30th April 1860*", p. 30 sj.

nombro da laboristoj. En la jaro 1850 oni uzis en la glatdrap-fabriko 875.830 ŝpinilojn, en 1856: 1.324.549 (pliiĝo de 51,2 elcentoj) kaj en 1862: 1.289.172 (malkresko de 2,7 elcentoj). Sed se oni dekalkulas la duobligajn ŝpinilojn, kiuj aperis en la statistiko por la jaro 1856, sed ne por 1862, tiam la nombro da ŝpiniloj restis ekde 1856 proksimume sama. Sed ekde 1850 oni multokaze duobligis la rapidon de la ŝpiniloj kaj teksiloj. La nombro da vaporteksiloj en la glatdrapo-fabriko estis en 1850: 32.617, en 1856: 38.956 kaj en 1862: 43.048. Ĉe ili estis okupataj en 1850: 79.737 personoj, en 1856: 87.794 kaj en 1862: 86.063, sed inter ili infanoj sub dekkvar-aĝaj en 1850: 9.956, en 1856: 11.228 kaj en 1862: 13.178. Malgraŭ la multe pli granda nombro da teksiloj, en 1862 kompare kun 1856, la tuta nombro da dungita laboro do malkreskis, tiu de la eks-pluatataj infanoj kreskis.[206]

La 27-an de aprilo 1863 la parlamentano Ferrand deklaris en la deputita ĉambro:

„Laboristaj delegitoj el 16 distriktoj de Lankaŝiro kaj Ĉeŝiro, en kies komisio mi parolas, informis min ke la laboro en la fabrikoj konstante kreskas pro plibonigo de la maŝinoj. Anstataŭ ke unu persono prizorgas du teksilojn, kiel antaŭe, li prizorgas nun tri sen helpantoj, kaj tute ne estas malkutime ke unu persono prizorgas kvar da ili ktp. Dekdu horoj da laboro, kiel evidentas el la informitaj faktoj, estas nun premataj en malpli ol dek laborhorojn. Estas do evidente, kiom ege la penoj de la fabriklaboristoj en la lastaj jaroj kreskis."[207]

Do, kvankam la fabrikinspektistoj senlace kaj plenprave laŭdas la bonajn rezultojn de la fabrikleĝoj de 1844 kaj de 1850, ili tamen koncedas, ke la mallongigo de la labortago kaŭzis intenson de la laboro kiu jam detruas la sanon de la laboristoj, do la laborforton mem.

---

206 „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1862*", p. 100, 103, 129, 130.

207 Per la moderna vaporteksilo teksisto fabrikas nun en sesdek horoj semajne sur du teksiloj 26 pecojn da certa speco de certa longo kaj larĝo, da kiu li povis sur la malnova vaporteksilo fabriki nur kvar. La tekskostoj de tia peco falis jam komence de la 1850-aj jaroj de 2 ŝilingoj 9 pencoj al kvin pencoj kaj okono.

*Aldono al la 2-a eldono:* „Antaŭ 30 jaroj" (1841) „oni postulis de kotonŝpinisto kun tri helpantoj nur la superrigardon de paro da ŝpinmaŝinoj (mule) kun 300 ĝis 324 ŝpiniloj. Kun kvin helpantoj li devas nun" (fine de 1871) „superrigardi ŝpinmaŝinojn (mules), kies nombro da ŝpiniloj estas 2.200, kaj li produktas almenaŭ sepoble pli da fadeno ol en 1841." (Alexander Redgrave, fabriinspektisto, en „*Journal of the Soc. of Arts*", 5-a de januaro 1872)

> „En la plej multaj fabrikoj de kotono, de silko ktp la elĉerpiga stato de ekscitiĝo, necesa por la laboro ĉe maŝinoj, kies moviĝo estis en la lastaj jaroj eksterordinare rapidigita, ŝajnas esti unu el la kaŭzoj de la ekscesa mortiĝo pro pulmmalsanoj, kiun d-ro Greenhow pruvis en sia lasta mirinda raporto."[208]

Ne estas la plej eta dubo, ke la tendenco de la kapitalo, ekde kiam la plilongigo de la labortago estas al ĝi per la leĝo definitive malpermesata, kompensiĝi per sistema altigo de la intensogrado de la laboro kaj transformi ĉian plibonigon de la maŝinoj en rimedon por pli granda elsuĉado de la laborforto, devas baldaŭ ree konduki al trunopunkto, kie refoja malpliigo de la laborhoroj fariĝas neevitebla.[209] Aliflanke la rapidmarŝo de la angla industrio de 1848 ĝis nun, do dum la periodo de la dekhora labortago, ankoraŭ multe pli superas la tempon de 1833 ĝis 1837, do la periodon de la dekduhora labortago, ol tiu la duan jarcenton ekde la enkonduko de la fabriksistemo, do la periodon de la nelimigita labortago.[210]

---

208 „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1861*", p. 25, 26.

209 La agitado por la okhora labortago komenciĝis nun (1867) en Lankaŝiro inter la fabriklaboristoj.

210 La sekva malmultaj nombroj montras la progreson de la proprasencaj fabrikoj (*factories*) en la Unuiĝinta Reĝlando ekde 1848: *(vd sekvapaĝe)*

En Lankaŝiro la fabrikoj multiĝis inter 1839 kaj 1850 nur je 4 elcentoj, inter 1850 kaj 1856 je 19 %, inter 1856 kaj 1862 je 33 %. Dum en ambaŭ dekunujaraj periodoj la nombro da dungitoj absolute pliiĝis, ĝi relative malpliiĝis. Kp „*Reports of Fact. for 31st Oct. 1862*", p. 63. En Lankaŝiro antaŭregas la kotonfabriko. Sed por vidi kian proporcion ĝi entute okupas en la fabrikado de fadeno kaj teksaĵo, sufiĉas scii ke ĝi sole ampleksas el ĉiuj tiaj fabrikoj en Anglio, Kimrio, Skotlando kaj Irlando 45,2 elcentojn, el ĉiuj ŝpiniloj 83,3 elcentojn, el ĉiuj vaporteksiloj 81,4 elcentojn, el ĉiu ilin movanta vaporforto 72,6 elcentojn kaj el la tuta dungitaro 58,2 elcentojn. (l.c., p. 62, 73)

## *Eksporto: kvanto*

| *jaro* | **1848** | **1851** | **1860** | **1865** |
|---|---|---|---|---|
| **kotonfabriko** | | | | |
| kotonfadeno (funtoj) | 135.831.162 | 143.966.106 | 197.343.655 | 103.751.455 |
| kudrofadeno (funtoj) | | 4.392.176 | 6.297.554 | 4.648.611 |
| kotonteksaĵo (jardoj) | 1.091.373.930 | 1.543.161.789 | 2.776.218.427 | 2.015.237.851 |
| **lin- kaj sisal-fabriko** | | | | |
| fadeno (funtoj) | 11.722.182 | 18.841.326 | 31.210.612 | 36.777.334 |
| teksaĵo (jardoj) | 88.901.519 | 129.106.753 | 143.996.773 | 247.012.329 |
| **silkfabriko** | | | | |
| diversspecaj fadenoj (funtoj) | *jaro 1846* | | | |
| | 466.825 | 462.513 | 897.402 | 812.589 |
| | | funtoj: | funtoj: | |
| teksaĵo (jardoj) | | 1.181.455 | 1.307.293 | 2.869.837 |
| **lanfabriko** | | | | |
| fadeno (funtoj) | | 14.670.880 | 27.533.968 | 31.669.267 |
| teksaĵo (jardoj) | | 151.231.153 | 190.371.537 | 278.837.418 |

## *Eksporto: valoro (en sterlingaj pundoj)*

| *jaro* | **1848** | **1851** | **1860** | **1865** |
|---|---|---|---|---|
| **kotonfabriko** | | | | |
| kotonfadeno | 5.927.831 | 6.634.026 | 9.870.875 | 10.351.049 |
| kontonteksaĵo | 16753369 | 23.454.810 | 42.141.505 | 46.903.796 |
| **lin- kaj sisal-fabriko** | | | | |
| fadeno | 493.449 | 951.426 | 1.801.272 | 2.505.497 |
| teksaĵo | 1.802.789 | 4.107.396 | 4.804.803 | 9.155.358 |
| **silkfabriko** | | | | |
| fadeno | 77.789 | 196.380 | 826.107 | 768.064 |
| teksaĵo | | 1.130.398 | 1.587.303 | 1.409.221 |
| **lanfabriko** | | | | |
| diversspecaj fadenoj | 776.975 | 1.484.544 | 3.843.450 | 5.424.047 |
| teksaĵo | 5.733.828 | 8.377.183 | 12.156.998 | 20.102.259 |

(Vd la blulibroj: „*Statistical Abstract for the U[nited] Kingd[om]*”, n-ro 8 kaj n-ro 13, Londono, 1861 kaj 1866)

# 4. La fabriko

Komence de tiu ĉi ĉapitro ni rigardis la korpon de la fabriko, la strukturon de la maŝinsistemo. Ni vidis poste, kiel la maŝinaro pliigas la homan ekspluatmaterialon de la kapitalo per alproprigo de virin- kaj infan-laboro, kiel ĝi konfiskas la tutan vivtempon de la laboristo per senmezura etendo de la labortago kaj kiel ĝia progreso, kiu ebligas liveri

ege kreskantan produkton en ĉiam malpli longa tempo, fine servas kiel sistema rimedo fluigi en ĉiu momento pli da laboro aŭ ekspluati la laborforton ĉiam pli intense. Ni turnas nin nun al la tutaĵo de la fabriko, kaj pli precize en ties plej elformita formo.

D-ro Ure, la Pindaro de la aŭtomata fabriko, priskribas ĝin unuflanke kiel

> „kunlaboradon de diversaj klasoj da laboristoj, plenkreskaj kaj neplenkreskaj, kiuj superrigardas kun lerteco kaj diligento sistemon de produktanta maŝinaro, kiu estas seninterrompe aktivigata de centra forto (la unua motoro)”,

aliflanke kiel

> „gigantan aŭtomaton, kunmetitan el sennombraj meĥanikaj kaj memkonsciaj organoj, kiuj agas interkonsente kaj seninterrompe, por produkti unu saman objekton, tiel ke ĉiuj ĉi organoj estas submetitaj al movforto kiu movas sin mem”.

Tiuj du esprimoj tute ne identas. En la unua la kombinita ĉiomlaboristo aŭ socia laborkorpo aperas kiel aktiva subjekto kaj la meĥanika aŭtomato kiel objekto; en la alia la aŭtomato estas mem la subjekto, kaj la laboristoj estas nur kiel konsciaj organoj apudmetitaj al la nekonsciaj organoj kaj kun tiuj subordigitaj al la centra movforto. La unua esprimo validas pri ĉia ebla grandskala apliko de maŝinoj, la alia karakterizas ĝian kapitalisman aplikadon kaj pro tio la modernan fabriksistemon. Pro tio, Ure ŝatas ankaŭ prezenti la centran maŝinon, el kiu la movo eliras, ne nur kiel aŭtomaton, sed kiel aŭtokraton.

> „En tiuj grandaj laborejoj la bonfara potenco de vaporo kunigas amasegon da subuloj ĉirkaŭ si.”[211]

Kun la laborilo ankaŭ la virtuozeco en ĝia gvidado transiras de la laboristo al la maŝino. La funkcikapablo de la ilo estas emancipita el la personaj limoj de homa laborforto. Per tio foriĝis la teĥnika bazo sur kiu la labordivido en la manufakturo baziĝas. Sur la lokon de la hierarĥio de la specialigitaj laboristoj, kiu karakterizas ĝin, venas do en la aŭtomata fabriko la tendenco samigi aŭ samniveligi la laborojn, kiujn la helpantoj de la maŝinoj devas plenumi,[212] sur la lokon de la artefarite kreitaj

211 Ure, l.c., p. 18.

212 l.c., p. 20. Kp Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero”, Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin; Pri J. P. Prudono (Letero al J. B. v. Schweitzer), tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-

diferencoj de la partlaboristoj venas precipe la naturaj diferencoj de aĝo kaj de sekso.

Kie en la aŭtomata fabriko la labordivido reaperas, ĝi estas unue disdivido de laboristoj inter la specialigitajn maŝinojn kaj de laboristaj amasoj, kiuj tamen ne formas strukturitajn grupojn, inter la diversajn departementojn de la fabriko, kie ili laboras ĉe apude vicigitaj samspecaj ilmaŝinoj, kie okazas do nur simpla kunlaborado inter ili. La strukturita grupo de la manufakturo estas anstataŭigita per la ligo inter la ĉeflaboristo kun malmultaj helpantoj. La esenca distingo estas tiu de laboristoj, kiuj estas vere okupataj ĉe la ilmaŝinoj (ĉi tie aldoniĝas kelkaj laboristoj por superrigardo aŭ por hejti la vapormaŝinon), kaj de nuraj braklaboristoj (preskaŭ ekskluzive infanoj) helpantaj tiujn maŝinlaboristojn. Al la braklaboristoj kalkuliĝas pli aŭ malpli ĉiuj *feeders* („nutristoj”, kiuj nur donas la prilaborotan materialon al la maŝinoj). Apud tiuj ĉefaj klasoj ekzistas nombre malgrava personaro taskita pri kontrolado de la tuta maŝinaro kaj pri ties konstanta riparado, ekz-e inĝenieroj, meĥanikistoj, lignaĵistoj ktp. Ĝi estas pli alta, parte science formita, parte metia laborista klaso, ekster la rondo de la fabriklaboristoj kaj al tiuj nur almetita.[213] Tiu divido estas pure teĥnika.

Ĉia laboro ĉe la maŝino necesigas fruan instruadon de la laboristo, por ke li lernu adapti sian propran movon al la samforme kontinua movo de aŭtomato. Tie, kie la maŝinaro mem formas sistemon de diversaj, samtempe agantaj kaj kombinitaj maŝinoj, ankaŭ la kunlaborado baziĝanta sur ĝi postulas disdividon de diversaj grupoj de laboristoj inter la diversajn maŝinojn. Sed la maŝinsistemo nuligas la neceson manufakture fiksi tiun disdividon per konstanta alproprigo de la sama laboristo al la sama funkcio.[214] Ĉar la tuta moviĝo de la fabriko ne eliras de la laboristo, sed de la

918300-08-3, p. 182, 133, 154.

213 Estas karakterize por la intenco de statistika trompo, kiu detale pruveblus ankaŭ alie, kiam la angla fabrikleĝo eksplicite ekskludas el sia agokampo la supre laste menciitajn laboristojn kiel ne-fabriklaboristojn, kaj alifanke la statistikoj (*returns*) publikigitaj de la parlamento same eksplicite inkludas en la kategorion de fabriklaboristoj ne nur inĝenierojn, meĥanikistojn ktp, sed ankaŭ fabrikdirektorojn, komizojn, mesaĝistojn, stokistojn, pakistojn ktp, do ĉiujn kun la sola escepto de la fabrikproprietulo mem; ĉio ĉi por pufigi la ŝajnan nombron da laboristoj okupataj de la maŝinoj. *[La lasta subfrazo el la franca eldono. -vl]*

214 Ure koncedas tion. Li diras, ke la laboristoj „en urĝa kazo laŭ la volo de la gvidanto delokeblas de unu maŝino al la alia”, kaj elkrias triumfe: „Tia ŝanĝo evidente kontraŭdiras la malnovan rutinon, kiu dividas la laboron kaj atribuas

maŝino, eblas konstante ŝanĝi personojn sen interrompo de la laborprocezo. La nekontesteblan pruvon de tio liveras la relajsosistemo[215] kiun la anglaj fabrikistoj enkondukis dum sia ribelo de 1848-1850. Fine, la rapideco, per kiu junuloj lernas laboron ĉe maŝino, forigas ankaŭ la neceson formi apartan klason de laboristoj ekskluzive kiel maŝinlaboristojn.[216] Sed la servoj de la nuraj braklaboristoj estas en la fabriko parte anstataŭigeblaj per maŝinoj, parte ili ebligas pro sia kompleta simpleco rapidan kaj konstantan ŝanĝon de la personoj ŝarĝitaj per tiu teda laboro.

Kvankam la maŝinsistemo teĥnike renversas la malnovan sistemon de labordivido, tiu unue plu trenas sin kutime en la fabriko kiel tradicio de la manufakturo, por esti poste reproduktata kaj firmigata de la kapitalo en eĉ pli naŭza formo kiel rimedo ekspluati la laborforton. El la vivolonga specialaĵo gvidi partan ilon fariĝas la vivolonga specialaĵo servi partan maŝinon. La maŝino estas misuzata por transformi la laboriston mem ekde lia infanaĝo en parton de partmaŝino.[217] Tiel ne nur konsiderinde reduktiĝas la kostoj de lia propra reproduktado, sed samtempe perfektiĝas lia senhelpa dependeco de la fabrikisto. Ĉi tie kiel ĉie necesas distingi inter la pli granda produktivo kaŭzita de la evoluo de la socia produktadprocezo kaj la pli granda produktivo kaŭzita de ĝia kapitalisma ekspluatado.

al iu laboristo la taskon fasoni la kapon de pinglo, al la alia ŝlifi ties pinton." Li prefere demandintus, kial tiu „malnova rutino" estas forlasita en la aŭtomata fabriko nur en „urĝa kazo".

215 Vd p.

216 En stato de urĝo, ekz-e dum la Usona Interna Milito, la burĝo uzas la fabriklaboriston esceptokaze por la plej maldelikataj laboroj, ekz-e por konstruado de vojoj ktp. La anglaj „*alternis nationaux*" (ŝtataj laborejoj) de la jaro 1862 kaj sekvaj por la senlaboraj kotonlaboristoj distingiĝis disde la francaj de 1848 en tio, ke en tiuj la laboristo devis fari surkoste de la ŝtato neproduktivajn laborojn, kaj pli malmultekoste ol la regulaj laboristoj, kun kiuj li estis ĵetita en konkurencon. „La korpa aspekto de la kotonlaboristoj sendube pliboniĝis. Tion mi kredas … koncerne la virojn inter ili, kaŭzita de la okupiĝo en libera aero ĉe publikaj laboroj." (Temas tie pri la *Preston*-fabriklaboristoj, kiuj estis laborigataj ĉe la „*Preston*-marĉo") („*Rep. of Insp. of Fact. Oct. 1863*", p. 59)

217 Laŭ tio oni povas aprezi la genian ideon de Prudono, kiu vidas en la maŝino sintezon ne de la laboriloj, sed „manieron rekunigi diversajn partlaborojn, kiujn la divido estis disiginta". Li faras krome tiun same historian kiel mirindegan malkovron ke „la periodo de la maŝinoj distingiĝas per aparta karaktero, tiu estas la salajreco". [*Laŭ fr. eld.*] – Kp Karlo Markso: La mizero de la filozofio …, v.c., p. 145.

En manufakturo kaj metio la laboristo uzas la ilon, en la fabriko li servas la maŝinon. Tie la moviĝo de la laborilo eliras de li, ĉi tie li devas sekvi ĝian moviĝon. En la manufakturo la laboristoj estas membroj de viva meĥanismo. En la fabriko ekzistas morta meĥanismo sendepende de ili, kaj ili estas enkorpigitaj al ĝi kiel vivantaj aneksaĵoj.

> „La mizera rutino de senfina laborturmento, en kiu la sama meĥanika procezo ĉiam denove plenumiĝas, similas al la laboro de Sizifo; la ŝarĝo de la laboro, same kiel la roko, ĉiam denove refalas sur la elĉerpiĝintan laboriston."[218]

Dum la maŝinlaboro ekstreme atakas la nervosistemon, ĝi subpremas la varian ludon de la muskoloj kaj konfiskas ĉian liberan korpan kaj spiritan agadon.[219] Eĉ la plifaciligo de la laboro fariĝas rimedo de torturo, ĉar la maŝino ne liberigas la laboriston de la laboro, sed liberigas lian laboron de la enhavo. Estas komune al ĉia kapitalisma produktado, se ĝi estas ne nur laborprocezo, sed samtempe procezo de plivalorigo de kapitalo, ke ne la laboristo uzas la laborkondiĉon, sed inverse la laborkondiĉo la laboriston, sed nur en la maŝinsistemo tiu inversigo ricevas teĥnike manipuleblan realecon. Per sia transformiĝo en aŭtomaton la laborrimedo ekstaras antaŭ la laboristo dum la laborprocezo mem, en formo de kapitalo, de morta laboro kiu dominas kaj elsuĉas la vivantan laborforton.

La disigo de la intelektaj kapabloj de la produktadprocezo disde la manlaboro kaj ilia transformado en povojn de la kapitalo super la laboro perfektiĝas, kiel ni indikis jam antaŭe, en la granda industrio konstruita surbaze de la maŝinsistemo. La speciala lerteco de la individua, elĉerpita maŝinlaboristo malaperas kiel eta flankaĵo antaŭ la scienco, la gigantaj naturfortoj kaj la socia amaslaboro, kiuj estas enkorpigitaj en la maŝinsistemo kaj konsistigas kun tiu la potencon de la „mastro" (*master*). Tiu mastro, en kies cerbo la maŝinaro kaj lia monopolo je ĝi estas nedisigeble kunkreskintaj, alkrias do en kazo de konflikto al siaj „manoj" malestime:

> „La fabriklaboristoj tenu en bonfara memoro la fakton ke ilia laboro estas efektive tre malalta speco de lerta laboro; ke neniu estas pli facile akirebla kaj

218 Friedrich Engels: Lage der arbeitenden Klasse in England, v.c., p. 217 <vd MEW 2, p. 398>. Eĉ tute ordinara, optimisma liberkomercisto, s-ro Molinari, rimarkigas: „Viro konsumiĝas pli rapide, se li superrigardas ĉiutage dum dekkvin horoj la samforman moviĝon de meĥanismo, ol se li en la sama tempo uzas sian korpan forton. Tiu laboro de superrigardo, kiu eble povus servi kiel utila gimnastiko por la spirito, se ĝi ne estus tro longe etendita, detruas dum longa daŭro, per sia troa mezuro, spiriton kaj korpon samtempe." (G. de Molinari: „*Etudes Économiques*", Parizo, 1846, [p. 49])

219 F. Engels, saml, p. 216 <MEW 2, p. 397/398>

konsidere ĝian kvaliton pli bone rekompencata, ke sufiĉas plej eta lernado por akiri la necesan lertecon. La maŝinoj de la mastro ludas fakte pli gravan rolon en la produktado ol la laboro kaj la lerteco de la laboristo kiuj akireblas per nur sesmonata instruado kaj kiujn simpla plugisto povas lerni."[220]

La teĥnika subordigo de la laboristo sub la samforman moviĝon de la laborilo kaj la aparta konsisto de la kolektiva laboristo el individuoj de ambaŭ seksoj kaj de ĉiuj aĝoj kreas kazernan disciplinon kiu elformiĝis al la kompleta fabriksistemo kaj kiu plene disvolvas la jam antaŭe menciitan laboron de superrigardo, do samtempe la dividon de la laboristoj en manlaboristojn kaj laborkontrolistojn, en ordinarajn industrisoldatojn kaj infanteri-suboficirojn.

„La ĉefa malfacilo en la aŭtomata fabriko konsistis en la necesa disciplino, por igi la homojn rezigni pri siaj malregulaj kutimoj kaj identiĝi kun la neŝanĝeblaj regulecoj de la granda aŭtomato. Sed inventi disciplinan kodekson, kiu kongruu kun la bezonoj de rapideco de la aŭtomata sistemo kaj sukcese realigi ĝin, estis entrepreno inda je Herkulo, jen la nobla faro de Arkwright! Eĉ nuntempe, kiam la sistemo estas organizita en sia tuta perfekteco, preskaŭ maleblas trovi inter la laboristoj, kiuj jam trapasis sian puberon, utilajn helpantojn por la aŭtomata sistemo."[221]

La fabrikkodekso, en kiu la kapitalo privatleĝe kaj laŭplaĉe formulas sian aŭtokratecon super siaj laboristoj, sen la alie ĉe la burĝaro tiom ŝatata divido de la potencoj kaj sen la ankoraŭ pli ŝatata reprezenta sistemo, estas nur la kapitalista karikaturo de la socia regulado de la laborprocezo, kiu fariĝas necesa kun la grandskala kunlaborado kaj kun la uzado de komunaj laborrimedoj, speciale de maŝinaro. Sur la lokon de la vipo de la sklavisto venas la punleĝaro de la gardisto. Ĉiuj punoj kompreneble solviĝas en monpunojn kaj reduktojn de salajro, kaj la leĝdona akravido de la fabrik-Likurgoj faras ke la rompo de iliaj leĝoj fariĝas por ili eble eĉ pli profitiga ol ilia observado.[222]

---

220(„*The Master Spinner's and Manufacturers' Defense Fund. Report of the Committee*", Manĉestro, 1854, p. 17) Ni vidos poste, ke la „mastro" kantas tute alian kanton, kiam perdo de liaj „vivantaj" aŭtomatoj minacas lin.

221Ure, l.c., p. 15. Kiu konas la vivon de Arkwright, tiu neniam ĵetos la epiteton „nobla" al la kapo de tiu genia frizisto. El ĉiuj grandaj inventistoj de la 18-a jarcento li estis senkonteste la plej granda ŝtelisto de fremdaj inventoj kaj la plej granda fiulo.

222„La sklaveco, en kiu la burĝaro tenas la proletaron katenita, montriĝas nenie pli klare ol en la fabriksistemo. Tie ĉia libereco ĉesas jure kaj fakte. La laboristo devas matene je la kvina kaj duono esti en la fabriko; se li venas kelkajn minutojn tro malfrue, li estas punota; se li venas dek minutojn tro malfrue, oni tute ne enlasas lin ĝis kiam la matenmanĝo pasis, kaj li perdas kvarontagon da sia salajro. Li devas manĝi, trinki kaj dormi laŭ ordono … La

Ni mencias ĉi tie nur la materiajn kondiĉojn, sub kiuj la fabriklaboro fariĝas. Ĉiuj sensorganoj estas same perturbataj de la artefarite altigita temperaturo, la atmosfero ŝarĝita de defalaĵoj de la krudmaterialo, la surdiga bruego ktp, sendepende de la mortdanĝero inter dense amasigita maŝinaro, kiu kun sezona reguleco produktas siajn industriajn batalbultenojn.[223] La tendenco ŝpari je sociaj produktadrimedoj, kiu forceje maturiĝis nur en la fabriksistemo, fariĝas en la mano de la kapitalo samtempe sistema rabado je la vivkondiĉoj de la laboristo dum la laboro, je spaco, aero, lumo kaj je personaj protektiloj kontraŭ la mortdanĝeraj aŭ malsan-

---

despota sonorilo vokas lin el la lito, vokas lin el la matenmanĝo kaj for de la tagmanĝo. Kaj kiel okazas nun en la fabriko? Tie la fabrikisto estas la absoluta leĝdonanto. Li dekretas fabrikregularojn laŭplaĉe; li ŝanĝas sian kodekson kaj faras aldonojn laŭplaĉe; kaj se li enmetas la plej grandajn frenezaĵojn, tiam la tribunaloj diras tamen al la laboristo: Ĉar vi libervole subiĝis al tiu kontrakto, vi devas nun ankaŭ obei ĝin … Tiuj laboristoj estas kondamnitaj vivi de sia naŭa jaro ĝis sia morto sub la spirita kaj korpa torturo." (Fr. Engels, l.c., p. 217 sj <Vd MEW vol. 2, p. 398-400>) Kion „la tribunaloj diras", tion mi klarigu al vi per du ekzemploj. La unua kazo ludas en Ŝefildo, fine de 1866. Tie laboristo dungiĝis por du jaroj en metalfabriko. Pro disputo kun la fabrikisto li forlasis la fabrikon kaj deklaris ke li neniaokaze volas plu labori por li. Li estis akuzita pro rompo de kontrakto kaj kondamnita je du monatoj da malliberejo. (Se la fabrikisto rompas la kontrakton, li akuzeblas nur civiljure kaj riskas nur monpunon.) Post la du monatoj da malliberejo, li ricevas de la fabrikisto asignon reveni en la fabrikon laŭ la malnova kontrakto. La laboristo deklaras: ne; ke li jam pune repagis la rompon de la kontrakto. La fabrikisto reakuzas, la tribunalo rekondamnas, kvankam unu el la juĝistoj, s-ro Shee, denuncas tion publike kiel monstraĵon, laŭ kiu homo povas esti dum sia tuta vivo ripete kaj ade punata, pro la sama delikto aŭ krimo. Tiu verdikto ne estis farita de la „Grandaj Nepagatoj", speco de provincaj nepagataj pacjuĝistoj (vd vol. 1, ĉap. 1-9, v.c., p. 335, n. 1), sed en Londono, de unu el la plej altaj kortumoj.

*Noto al la 4-a eldono:* Tio estas nun forigita. Kun la escepto de kelkaj malmultaj kazoj – ekz-e ĉe publikaj gasfabrikoj – en Anglio la laboristo estas nun ĉe rompo de kontrakto egaligita al la dungisto kaj akuzeblas nur civiljure. – *F. E.}*

– La dua kazo okazas en *Wiltshire*, fine de novembro 1863. Proksimume 30 teksistinoj ĉe vaporteksilo, dungitaj de iu Harrupp, tukfabrikisto de *Leower's Mill*, *Westbury Leigh*, faris strikon, ĉar tiu sama Harrupp havis la agrablan kutimon redukti al ili la salajron pro matena malfruiĝo, kaj pli precize 6 pencojn por 2 minutoj, 1 ŝilingon por 3 minutoj kaj 1 ŝilingon 6 pencojn por 10 minutoj. Tio faras ĉe 9 ŝilingoj hore 4 sterlingajn pundojn 10 ŝilingojn por unu tago, dum ilia mezuma salajro neniam superis 10 ĝis 12 ŝilingojn semajne. Harrupp taskis ankaŭ knabon por trumpeti la fabrikhoron, kion li kelkfoje

igaj cirkonstancoj de la produktadprocezo, sen paroli pri instalaĵoj por la komforto de la laboristo.[224] Ĉu Furiero malpravas kiam li nomas la fabrikojn „mildigitaj punlaborejoj”?[225]

## 5. Batalo inter laboristo kaj maŝino

La batalo inter kapitalisto kaj dunglaboristo komenciĝas per la kapital-

faras mem antaŭ la 6-a matene, kaj se la manoj ne akurate ĉeestas en la momento kiam li ĉesas blovi, oni fermas la pordegojn kaj monpunas la esktere alvenintojn; kaj ĉar en la konstruaĵo estas nenia horloĝo, la malfeliĉaj manoj estas en la povo de la juna tempgardisto inspirita de Harrupp. La strikantaj manoj, familiaj patrinoj kaj knabinoj, deklaris ke ili volas ree labori se la tempgardisto estas anstataŭita de horloĝo kaj pli racia puntarifo enkondukita. Harrupp venigis 19 virinojn kaj knabinojn antaŭ la juĝistojn pro rompo de kontrakto. Ili estis kondamnitaj je 6 pencoj da puno kaj 2 ŝilingoj 6 pencoj da kostoj, sub laŭta indigniĝo de la aŭskultantoj. Harrupp estis akompanata ekde la juĝejo de siblanta popolamaso. – Preferata operacio de la fabrikistoj estas puni la laboristojn per dedukto de salajro pro la mankoj de la materialo liverita al ili. Tiu metodo provokis en la jaro 1866 ĝeneralan strikon en la anglaj potfaristaj distriktoj. La raportoj de la „*Child. Employm. Commiss.*” (1863-1866) citas kazojn, en kiuj la laboristo, anstataŭ ricevi salajron, per sia laboro, kaj pere de la punregularo, fariĝas krome ŝuldanto de sia nobla mastro. La lasta kotonkrizo liveris ankaŭ edifajn trajtojn de la sagaco de la fabrik-aŭtokratoj koncerne salajro-redukton. „Mi devis mem”, diras la fabrikinspektisto R. Baker, „antaŭ nelonge meti plendon kontraŭ kotonfabrikisto, ĉar li en tiuj malfacilaj kaj turmentaj tempoj deprenis 10 pencojn el la salajro de kelkaj el la ‘junaj’ (pli ol dektrijaraj) laboristoj pro la kuracista atesto, kiu kostas al li nur 6 pencojn kaj por kiu la leĝo permesas nur redukton de 3 pencoj, la venigon neniom … Alia fabrikisto, por atingi la saman celon sen konflikto kun la leĝo, igas ĉiun el la kompatindaj infanoj, kiuj laboras por li, pagi unu ŝilingon kiel kompensaĵon por lernado de la arto kaj de la mistero ŝpini, ekde kiam la kuracista atesto deklaras ilin maturaj por tiu okupiĝo. Ekzistas do kaŝitaj detaloj, kiujn oni devas koni, por kompreni tiajn eksterordinarajn fenomenojn kiel strikojn en tempoj kiel la nunaj” (temas pri striko en la fabriko de Darvan, en junio 1863, inter la maŝinteksistoj). („*Reports of Insp. of Fact. for 30th April 1863*”, p. 50, 51) (La fabrikraportoj etendiĝas ĉiam trans sia oficiala dato.)

223 La leĝoj por protekto kontraŭ danĝeraj maŝinoj efikis bonfare. „Sed … nun ekzistas novaj fontoj de akcidentoj, kiuj ne ekzistis antaŭ 20 jaroj, nome la pli granda rapido de la maŝinaro. Radoj, cilindroj, ŝpiniloj kaj teksiloj estas nun movataj per pli granda kaj ĉiam kreskanta povo; la fingroj devas pli rapide kaj

rilato mem. Ĝi plu furiozas dum la tuta manufaktura periodo.[226] Sed nur ekde la enkonduko de la maŝinaro la laboristo kontraŭbatalas la laborrimedojn mem, la materian ekzistadmanieron de la kapitalo. Li ribelas kontraŭ tiu preciza formo de la produktadrimedo kiel materia bazo de la kapitalisma produktadmaniero.

Preskaŭ la tuta Eŭropo travivis dum la 17-a jarcento laborist-ribelojn kontraŭ la tiel nomata rubanda teksilo, maŝino por teksi rubandojn kaj pasamentojn, nomata en Germanio *Bandmühle* aŭ *Mühlenstuhl*.[227] Fine de la unua triono de la 17-a jarcento, ventsegilo, konstruita de nederlandano

---

pli trafe kapti la rompitan fadenon, ĉar se ili agas hezite aŭ malprudente, ili viktimiĝas. … Granda nombro da akcidentoj kaŭziĝas per la hasto de la laboristoj fari sian laboron rapide. Necesas memori ke por la fabrikistoj estas plej grave teni sian maŝinaron seninterrompe en moviĝo, t.e. produkti fadenon kaj teksaĵon. Ĉia unuminuta halto estas ne nur perdo da movforto, sed ankaŭ de produktaĵo. La laboristoj estas do pelataj, per la laborgardistoj, interesataj pri kvanto de la produkto, teni la maŝinaron en movo; kaj tio estas ne malpli grava por la laboristoj, kiuj estas pagataj laŭ pezo aŭ peco. Do, kvankam en la plej multaj fabrikoj estas malpermesate purigi la maŝinojn movantaj, tiu praktiko estas ĝenerala. Sole tiu kaŭzo produktis dum la lastaj 6 monatoj 906 akcidentojn … Kvankam la purigado okazas ĉiutage, la sabato estas tamen plej ofte fiksita por ĝisfunda purigado de la maŝinoj, kaj tio okazas grandparte dum la moviĝo de la maŝinoj … Tio estas operacio nepagata, kaj la laboristoj provas do fini ĝin kiom eble plej rapide. Pro tio la nombro da akcidentoj estas vendrede kaj speciale sabate multe pli granda ol dum la ceteraj tagoj de la semajno. Vendrede la kromaĵo super la mezuma nombro de la unuaj 4 tagoj estas 25 %; sed se oni konsideras ke la fabriktago estas sabate nur $7^1/_2$ horoj, dum la ceteraj semajntagoj $10^1/_2$ horoj, – tiam la kromaĵo estas pli ol 65 %." („*Reports of Insp. of Factories for etc. 31st October 1866*", Londono, 1867, p. 9, 15, 16, 17)

224 En la unua sekcio de la Tria Libro mi raportos pri lastatempa kampanjo de la anglaj fabrikistoj kontraŭ la klaŭzoj de la fabrikleĝo por protekti la membrojn de la „manoj" kontraŭ mortdanĝera maŝinaro. Ĉi tie sufiĉu citaĵo el oficiala raporto de la fabrikinspektisto Leonard Horner: „Mi aŭdis paroli fabrikistojn kun nepardonebla frivoleco pri kelkaj el la akcidentoj, ekz-e ke perdo de fingro estus bagatelo. La vivo kaj la perspektivoj de laboristoj dependas tiom de liaj fingroj, ke tia perdo estas por li ekstreme serioza okazaĵo. Kiam mi aŭdas tiom senpripensan babiladon, mi faras ofte la demandon: Supozite ke vi bezonas kroman laboriston, kaj du da ili kandidatas, ambaŭ en ĉiu alia rilato same taŭgaj, sed unu sen dikfingro aŭ montrofingro, kiun el ili vi elektus? Ili hezitis eĉ ne momenton por decidiĝi por la ĉiufingrulo … Tiuj sinjoroj fabrikistoj havas malĝustajn antaŭjuĝojn kontraŭ tio kion ili nomas pseŭdohomaman leĝaron." („*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1855*", [p. 6/7]) Tiuj sinjoroj estas „saĝuloj" kaj ne senkiale entuziasmiĝas pri la sklavist-

proksime de Londono, pereis pro ekscesoj de la plebo. Ankoraŭ komence de la 18-a jarcento segmaŝinoj movataj per akvo superis en Anglio nur pene la parlamente subtenatan popolrezistadon. Post kiam Everet en 1758 konstruis la unuan akve movatan maŝinon por lantondado, ĝi estis bruligita de 100.000 senlaborigitaj homoj. Kontraŭ la kard-mueliloj kaj la kardmaŝinoj de Arkwright 50.000 laboristoj faris parlamentan peticion, kiuj ĝis tiam vivtenis sin per kardado de lano. La amasaj detruadoj de maŝinoj en la anglaj manufakturdistriktoj dum la unuaj 15 jaroj de la 19-a jarcento, speciale pro la ekspluatado de la vaporteksilo, donis, sub la

---

ribelo!

225 En la fabrikoj, kiuj estis plej longe submetitaj al la fabrikleĝo kun ties deviga limigo de la labortempo kaj ĝiaj ceteraj reguladoj, kelkaj el la antaŭaj misuzoj malaperis. La plibonigo de la maŝinaro mem postulas ĉe certa punkto „pli bonan konstruon de la fabrikkonstruaĵoj”, kiu efikas favore al la laboristoj. (kp „*Reports etc. for 31st Oct. 1863*”, p. 109)

226 Vd i.a. John Houghton: „*Husbandry and Trade improved*”, Londono, 1727. „*The Advantages of the East India Trade*”, 1720. John Bellers, l.c. „La majstroj kaj la laboristoj troviĝas inter si malfeliĉe en eterna stato de milito. Tiuj havas la senŝanĝan celon ricevi sian laboron farita kiom eble plej malmultekoste; kaj ili ne hezitas uzi tiucele ĉian ajn ruzaĵon, dum tiuj ĉi emas same, ĉe ĉia okazo devigi siajn majstrojn plenumi iliajn pli altajn postulojn.” „*An Inquiry into the causes of the Present High Prices of Provisions*”, 1767, p. 61, 62. (Aŭtoro: Rev. Nathaniel Forster, tute surflanke de la laboristoj)

227 La rubandteksilo estis inventita en Germanio. La itala abato Lancelotti rakontas en skribaĵo kiu aperis 1636 en Venecio: „Anton Müller el Dancigo vidis antaŭ proksimume 50 jaroj (L. verkis en 1629) tre genian maŝinon en Dancigo, kiu produktis 4 ĝis 6 teksaĵojn samtempe; sed ĉar la urbestro timis ke tiu inventaĵo povus transformi multajn laboristojn en almozpetantojn, li kaŝis la inventaĵon kaj igis sekrete strangoli aŭ dronigi la inventinton.” En Lejdeno la sama maŝino estis uzata unue en 1629. Sed la ribeloj de la pasamentistoj devigis la urban konsilantaron unue malpermesi ĝin; per diversaj dekretoj de 1623, 1639 ktp de la Ĝeneralaj Ŝtatoj de Nederlando ĝia uzado devis esti limigita; fine permesata, sub certaj kondiĉoj, per la dekreto de la 15-a de decembro 1661. „En tiu urbo”, diras Boxhorn („*Institutiones Politicae.*”, 1663) pri la enkonduko de la rubandteksilo en Lejdeno, „antaŭ proksimume dudek jaroj iuj inventis instrumenton por teksi, per kiu unuopulo povis pli facile produkti pli da teksaĵo ol alie pluraj en la sama tempo. Pro tio okazis tumultoj kaj plendoj de la virinoj, ĝis kiam la uzado de tiu instrumento estis malpermesita de la urba konsilantaro.” La sama maŝino estis en la jaro 1676 en Kolonjo malpermesita, kaj ĝia enkonduko en Anglio kaŭzis samtempajn tumultojn de laboristoj. Per imperiestra edikto de la 19-a de februaro 1685 ĝia uzado estis malpermesata en tuta Germanio. En Hamburgo ĝi estis laŭ ordono

nomo de *luddita* movado, al la kontraŭjakobena registaro de Sidmouth, *Castlereagh* ktp la pretekston por plej reakciaj perfortaĵoj. Necesas tempo kaj sperto, antaŭ ol la laboristo lernas distingi la maŝinaron disde ĝia kapitalisma uzado kaj pro tio transigi siajn atakojn de la materiaj produktadrimedoj mem al ties socia formo de ekspluatado.[228]

La bataloj pri salajro ene de la manufakturon antaŭkondiĉas la manufakturon kaj tute ne estas direktitaj kontraŭ ties ekzistado. Kiam oni foje batalas kontraŭ la starigo de manufakturo, la atakojn faras la gildaj majstroj kaj privilegiitaj urboj, ne la dunglaboristoj. Pro tio, verkistoj de la manufakturperiodo prezentas la labordividon precipe kiel rimedon anstataŭigi eventuale mankantajn laboristojn, sed ne forigi laborantajn laboristojn. Tiu diferenco estas evidenta. Se oni diras ekzemple, ke en Anglio necesus cent milionoj da homoj por ŝpini per la malnova ŝpinrado la kotonon kiu estas nun ŝpinata de 500.000 homoj per la maŝino, tio kompreneble ne signifas ke la maŝino okupis la laborlokon de tiuj milionoj, kiuj neniam ekzistis. Tio signifas nur, ke multaj milionoj da laboristoj necesus por anstataŭi la ŝpinmaŝinaron. Sed se oni male diras, ke la vaporteksilo en Anglio senlaborigis 80.000 teksistojn, tiam oni ne parolas pri ekzistanta maŝinaro anstataŭota de certa nombro da laboristoj, sed pri ekzistanta nombro da laboristoj kiuj estis fakte anstataŭitaj aŭ elŝovitaj de maŝinoj. Dum la manufakturperiodo la metia entrepreno, eĉ se dismetita, restis la bazo. La novaj koloniaj merkatoj ne kontentigeblis per la relative malgranda nombro da urbaj laboristoj hereditaj el la mezepoko, kaj la propradiraj manufakturoj malfermis samtempe novajn produktadkampojn al la kamparanoj, kiuj, kun la ĉeso de la feŭda sistemo, estis forpelitaj el la grundo kiun ili ĝis tiam estis prilaborintaj. Tiutempe do montriĝis pli la pozitiva flanko de la labordivido kaj de la kunlaborado en la laborejoj, nome ke ĝi igis dungitajn laboristojn pli produktivaj.[229]

de la urba konsilantaro publike forbruligita. Karolo la 6-a renovigis la 9-an de februaro 1719 la edikton de 1685, kaj Elekt-Saksio permesis ĝian publikan uzadon nur en 1765. Tiu maŝino, kiu kaŭzis tiom da bruo en la mondo, estis fakte la antaŭulo de la ŝpin- kaj teks-maŝinoj, do de la industria revolucio de la 18-a jarcento. Ĝi kapabligis al knabo tute sensperta pri teksado, per simpla de- kaj al-puŝado de stango, funkciigi la tutan teksilon kun ĉiuj ĝiaj navetoj, kaj tiel ĝi liveris, en sia plibonigita formo, 40 ĝis 50 pecojn samtempe.

228 En eksmodaj manufakturoj ankoraŭ nuntempe ripetiĝas kelkfoje la kruda formo de laboristribeloj kontraŭ la maŝinaro. Tiel ekz-e 1865 koncerne ŝlifadon de fajliloj en Ŝefildo.

229 Sir James Steuart prezentas ankaŭ la efikon de la maŝinoj tute en tiu senco. „Mi konsideras la maŝinojn do kiel rimedon por altigi (laŭ ilia efikeco) la nombron da agantaj homoj, sen ke oni devas nutri pli da ili … Per kio la efiko

Kunlaborado kaj kombinado de la laborrimedoj en la manoj de malmultaj personoj, aplikataj en kampkulturo, kaŭzas ja grandajn, subitajn kaj perfortajn revoluciojn en la produktadmaniero kaj do de la vivkondiĉoj kaj laboreblecoj de la kampara loĝantaro, en multaj landoj longe antaŭ la periodo de la granda industrio. Sed tiu batalo okazas origine pli inter grandaj kaj malgrandaj grundproprietuloj ol inter kapitalo kaj dunglaboro; aliflanke, kie laboristoj estas forpuŝitaj per laborrimedoj, per ŝafoj, ĉevaloj ktp, rektaj perfortaĵoj konsistigas tie unue la kondiĉon por industria revolucio. Unue oni forpelas la laboristojn el la grundo, kaj poste venas la ŝafoj. Nur la grandskala grundŝtelado, kiel en Anglio, preparas la agadkampon por la granda kampkulturado.[230] Pro tio, tiu revolucio de la kampkulturo havas en sia komenco pli la aspekton de politika revolucio.

Kiel maŝino la laborrimedo fariĝas tuj konkuranto de la laboristo mem.[231] La memvalorigo de la kapitalo per la maŝino staras en rekta proporcio al la kvanto de laboristoj, kies ekzistadkondiĉojn ĝi neniigas. La tuta sistemo de la kapitalisma produktado baziĝas sur tio ke la laboristo vendas sian laborforton kiel varon. La labordivido unuflankigas tiun laborforton por la tute aparta sorto konduki partan ilon. Ekde kiam la kondukado de la ilo fariĝas tasko de la maŝino, kun la uzvaloro de la laborforto estingiĝas ĝia interŝanĝvaloro. La laboristo fariĝas nevendebla, kvazaŭ eksvalida papermono. La parto de la laborista klaso, kiun la maŝino tiel transformas en superfluan, do por la memvalorigo de la kapitalo jam ne rekte necesan loĝantaron, unuflanke pereas en la malegala batalo de la malnova metieca kaj manufaktureca entrepreno kontraŭ la

de maŝino distingiĝas de la efikeco de novaj loĝantoj?” (Franca Traduko, vol. I, I. I, ĉap. XIX) Multe pli naiva estas Petty, kiu diras ke ĝi anstataŭas la poliginion. Tiu vidpunkto kongruas eble por kelkaj partoj de Usono. Sed: „Maŝinoj malofte uzeblas sukcese malgrandigi la laboron de unuopulo: ĉe ĝia konstruado oni perdus pli da tempo ol oni ŝparus ĉe ĝia uzado. Ĝi estas vere utila nur se ĝi efikas sur grandaj amasoj, se unu sola maŝino povas subteni la laboron de miloj. Maŝinsistemo estas do uzata plej ofte en la plej riloĝataj landoj, kie ekzistas plej multaj senlaboruloj … Ĝi estas uzata ne pro manko da laboristoj, sed pro la facileco per kiu oni povas amase laborigi ilin.” (Piercy Ravenstone: „*Thoughts on the Funding System and its Effects*”, Londono, 1824, p. 45)

230 *Noto al la 4-a eldono:* Tio validas ankaŭ pri Germanio. Kie en nia lando ekzistas granda kampkulturado, do precipe en la oriento, ĝi fariĝis ebla nur per la forigo de kampuloj el komuna grundo (*Bauernlegen*), praktiko kiu disvastiĝis en la 16-a jarcento kaj speciale ekde 1648. – F. Engelso.

231 „Maŝino kaj laboro estas en konstanta konkurenco.” (Ricardo, l.c., p. 479)

maŝineca, aliflanke inundas ĉiujn pli facile alireblajn industribranĉojn, troplenigas la labormerkaton kaj per tio malaltigas la prezon de la laborforto sub ties valoron.

Por konsoli la laboristojn falintajn en mizeron, oni asertas ke iliaj suferoj estas nur „dumtempa” ĝeno (*a temporary inconvenience*), parte ke la maŝino nur iom post iom trudiĝas al tuta produktadkampo, per kio la amplekso kaj la intenso de ĝia detrua efiko fariĝas malpli granda. Unu konsolo batas la alian. Kie la maŝino iom post iom trudiĝas al produktadkampo, ĝi produktas kronikan mizeron en la laborista tavolo kiu konkurencas kun ĝi. Kie la transiro okazas rapide, ĝi efikas amase kaj akre. La mondhistorio ne donas pli teruran spektaklon ol la iom-post-ioman, tra kvar jardekoj treniĝanta kaj en 1838 finita pereo de la anglaj permanaj kotonteksistoj. Multaj el ili malsatmortis, multaj vegetis longe kun siaj familioj per $2^{1}/_{2}$ pencoj tage.[232] Sed la angla kotonmaŝino efikis akre al Orienta Hindio, kies ĝenerala guberniestro konstatis en 1834-1835:

> „La reganta mizero apenaŭ trovas paralelon en la historio de la komerco. La ostoj de la kotonteksistoj blankigas la ebenaĵojn de Hindio.”

Tamen, se tiuj teksistoj adiaŭis por eterne, la maŝino kaŭzis al ili nur „portempajn ĝenojn”. Cetere, la „portempa” efiko de la maŝinoj estas konstanta, per tio ke ĝi konstante trudiĝas al novaj produktadkampoj. La memstarigita kaj fremdigita formo, kiun la kapitalisma produktadmaniero entute donas al la laborkondiĉoj kaj al la laborprodukto de la laboristo,

232 La konkurenco inter permana teksado kaj maŝinteksado estis en Anglio plilongigita antaŭ la enkonduko de la malriĉulleĝo de 1834 per tio ke oni kompletigis la salajrojn falintajn profunde sub la minimumon per subteno de la pastrejoj. „*Reverend* s-ro Turner estis 1827 pastro en *Wilmslow* en *Cheshire*, industria distrikto. La demandoj de la komitato pri elmigro kaj la respondoj de s-ro Turner montris, kiel la konkurado de la manlaboro kun la maŝinsistemo estas daŭrigata. Demando: ‘Ĉu la aplikado de la vaporteksilo ne forŝovis tiun de la manteksilo?’ Respondo: ‘Sendube; ĝi forpuŝintus ĝin ankoraŭ pli ol kiel okazis, se la manteksistoj ne estus kapabligitaj submetiĝi al reduktita salajro.’ Demando: ‘Sed la manteksisto per tiu submetiĝo ja kontentiĝis per salajro kiu estas nesufiĉa por ilia vivtenado, kaj postulas pastrejan aldonon por la resto de sia vivtenado?’ Respondo: ‘Jes, kaj efektive *la* konkuro inter la manteksilo kaj la vaporteksilo estas daŭrigata per la subtenado por malriĉuloj.’ Tiel do humiliga paŭpereco aŭ elmigrado estas la avantaĝo kiun la enkonduko de la maŝinsistemo alportis al la laboristoj, el respektataj kaj certagrade sendependaj metiistoj ili estis subpremitaj al humilaĉaj mizeruloj, kiuj manĝas la humiligan panon de karitato. Tion oni nomas portempa ĝeno.” („*A Prize Essay on the Comparative Merits of Competition and Co-operation*”, Londono, 1834, p. 29)

evoluas do kun la maŝinsistemo al kompleta antagonismo.[233] Pro tio, samtempe kun ĝi, por la unua fojo la laboristo brutale ribelas kontraŭ la laborrimedo.

La laborrimedo plene elĉerpas la laboriston. Tiu rekta antagonismo[234] aperas tamen plej palpeble, ekde kiam nove enkondukita maŝinaro konkuras kun tradicia metia aŭ manufaktura entrepreno. Sed ene de la granda industrio mem la konstanta plibonigo de la maŝinoj kaj disvolvado de la aŭtomata sistemo efikas analoge.

> „La konstanta celo de plibonigita maŝinaro estas malpliigi la manlaboron aŭ kompletigi ĉeneron en la produktadĉeno de la fabriko per substituado de feraj al homaj aparatoj."[235] „La aplikado de vapor- kaj akvo-forto al maŝinaro, kiu estis ĝis nun movata mane, estas ĉiutaga evento … La malgrandaj plibonigoj de la maŝinaro, kiuj celas ŝparon de movforto, plibonigo de la kvalito, celanta pli da produktoj en la sama tempo aŭ forigon de infano, de virino aŭ de viro, estas konstantaj, kaj kvankam ŝajne ne tre gravaj, ili tamen havas gravajn rezultojn."[236] „Ĉie, kie operacio postulas lertecon kaj sekuran manon, oni kiom eble plej rapide forprenas ĝin el la brakoj de la laboristo tro lerta aŭ ema al ĉiaj malregulecoj, por taski pri ĝi apartan meĥanismon, kiu estas tiom bone reguligita, ke infano povas superrigardi ĝin."[237] „En la aŭtomata sistemo la

233 *„La sama kaŭzo kiu kreskigas la netan enspezon de lando* (t.e., kiel Ricardo samloke klarigas, la enspezoj de la *landlords* kaj kapitalistoj, kies *wealth* [riĉeco, abundo], ekonomie konsiderata, ĝenerale = riĉeco de la nacio), *povas samtempe krei abundon da loĝantaro kaj malbonigi la situacion de la laboristo."* (Ricardo, l.c., p. 469) *„La konstanta celo kaj la tendenco de ĉia perfektigo de la meĥanismo estas efektive, tute seniĝi je la laboro de la homo aŭ malaltigi ĝian prezon per substituado de virin- kaj infan-laboro al la plenkreskaj virlaboristoj aŭ mallertajn laboristojn al lertaj."* (Ure, [l.c., p. 23])

234 Originale: *Gegensatz* = antagonismo, laŭvorte: kontraŭdiro; sed ankaŭ *Widerspruch* = kontraŭdiro. La angla kaj franca versioj tradukas ĉi tie per *antagonism* resp. *antagonisme* = antagonismo. -vl

235 „*Reports of Insp. of Fact. 31st Oct. 1858*", p. 43.

236 „*Reports etc. 31st Oct. 1856*", p. 15.

237 Ure, l.c., p. 19. *„La granda avantaĝo de la maŝinoj uzataj en brikfarado konsistas en tio, fari la uzanton tute sendependa de lertaj laboristoj."* („*Child. Empl. Comm., V. Report*", Londono, 1866, p. 130, n. 46)

Aldono al la 2-a eld.: S-ro Sturrock, intendanto de la maŝindepartemento de la *Great Northern Railway*, deklaras koncerne la maŝinkonstruadon (de lokomotivoj ktp): „Multekostaj" (expensive) „anglaj laboristoj estas ĉiutage malpli necesaj. La produktado estas pliigata per uzado de pli bonaj iloj, kaj tiuj iloj estas servataj de malalta speco de laboro (a low class of labour) … Antaŭe,

> talento de la laboristo estas iom post iom anstataŭata."[238] „La plibonigo de la maŝinoj efikas ne nur per malpliigo de la dungitaj plenkreskaj laboristoj por atingi certan rezulton, sed ĝi substituas klason de individuoj al alia klaso, malpli lertan al pli lerta, infanojn al plenkreskuloj, virinojn al viroj. Ĉiuj ĉi ŝanĝoj kaŭzas konstantajn fluktuadojn en la kvoto de la salajro."[239] „La maŝinsistemo senĉese elĵetas plenkreskulojn el la fabriko."[240]

La eksterordinara elasteco de la maŝinsistemo pro akumulita praktika sperto, pro la jam ekzistanta amplekso de meĥanikaj rimedoj kaj por la konstanta progreso de la teĥniko montris al ni sian rapidmarŝon sub la premo de mallongigita labortago. Sed kiu supozintus en 1860, en la kulmina jaro de la angla kotonindustrio, la galopajn plibonigojn de la maŝinoj kaj la respondan forigon de manlaboro, kaŭzitajn de la tri sekvaj jaroj sub la sprono de la usona interna milito? El la oficialaj citaĵoj de la anglaj fabrikinspektistoj pri tiu punkto sufiĉas ĉi tie kelkaj ekzemploj. Manĉestra fabrikisto deklaras:

> „Anstataŭ 75 kardomaŝinoj ni bezonas nun nur 12, kiuj liveras la saman kvanton da same bona, se ne pli bona kvalito … La ŝparo de salajro estas 10 sterlingaj pundoj semajne, tiu de kotondefalaĵo 10 elcentoj."

En manĉestra fajnŝpinejo oni

> „forigis per pli rapida movo kaj enkonduko de diversaj memagaj procezoj en iu departemento kvaronon, en alia pli ol duonon de la laborista personaro, dum la kombmaŝino en la loko de la dua kardomaŝino tre malaltigis la nombron da manoj antaŭe okupataj en la kardejo".

Alia ŝpinfabriko taksas sian ĝeneralan ŝparon de „manoj" je dek elcent-oj. La s-roj Gilmore, ŝpinistoj en Manĉestro, deklaras:

> „En nia blov-departemento ni taksas la ŝparon de manoj kaj de salajro pro novaj maŝinoj je plena triono … en la bobenejo kaj etendejo proksimume trionon malpli da elspezoj kaj manoj; en la ŝpinejo proksimume trionon malpli da elspezo. Sed tio ne estas ĉio; kiam nia fadeno nun iras al la teksisto, ĝi estas tiom plibonigita per la aplikado de novaj maŝinoj, ke ili produktas pli da

---

lerta laboro produktis nepre ĉiujn partojn de la vapormaŝino. La samaj partoj produktiĝas nun per malpli lerta laboro, sed per bonaj iloj … Per iloj mi celas la maŝinojn de inĝeniero, tornilojn, rabotmaŝinojn, bormaŝinojn ktp (uzatajn ĉe konstruado de maŝinoj)." („*Royal Commission on Railways. Minutes of Evidence*", n-roj 17, 862 kaj 17863, Londono, 17, 867)

238 Ure, l.c., p. 20.

239 Saml., p. 321.

240 Saml., p. 23.

teksaĵo kaj pli bonan ol per la malnova maŝinfadeno."[241]

La fabrikinspektisto A. Redgrave rimarkigas pri tio:

> „La malpliigo de la laboristoj ĉe pli da produktado rapide progresas; en la lanfabrikoj antaŭ nelonge komenciĝis nova reduktado de manoj, kaj ĝi daŭras plu; antaŭ malmultaj tagoj instruisto, kiu loĝas apud *Rochdale*, diris al mi, ke la granda malpliiĝo en la knabinlernejoj estis kaŭzita ne nur de la krizo kaj ties premo, sed ankaŭ de la ŝanĝoj en la maŝinaro de la lanfabriko, pro kiu okazis reduktado de mezume sepdek duontempuloj."[242]

La ĝenerala rezulto de la meĥanikaj perfektigoj, kiuj pro la usona interna milito enkondukiĝis en la anglaj kotonfabrikoj, resumiĝas en la sekva tabelo *(sekvapaĝe)*.

De 1861 ĝis 1868 malaperis do 338 kotonfabrikoj; tio signifas ke pli produktiva kaj pli grandskala maŝinaro koncentriĝis en la manoj de pli malgranda nombro da kapitalistoj. La nombro da vaporteksiloj malpliiĝis je 20.663; sed ilia produkto samtempe pliiĝis, tiel ke pli bona teksilo liveris nun pli ol malnova. Fine la nombro da ŝpiniloj kreskis je 1.612.547, dum la nombro da dungitaj laboristoj malkreskis je 50.505. La „portempa" mizero, per kiu la kotonkrizo premis la laboristojn, estis do pliigita kaj firmigita de la rapida kaj daŭra progreso de la maŝinaro.

Sed la maŝinoj efikis ne nur kiel superpotenca konkuranto, ĉiam preta „superfluigi" la dunglaboriston. La kapitalo laŭte kaj tendence proklamas kaj manipulas ĝin kiel potencan malamikan al la laboristo.

241 *„Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1863"*, p. 108 sj.

242 Saml., p. 109. La rapida plibonigo de la maŝinoj dum la kotonkrizo ebligis al la anglaj fabrikistoj tuj post la fino de la usona interna milito, kaj fulmrapide, ree superplenigi la mondmerkaton. La teksaĵoj jam dum la lastaj ses monatoj de 1866 fariĝis preskaŭ nevendeblaj. Per tio komenciĝis la komisia sendado de varoj al Hindio kaj Ĉinio, kio kompreneble ankoraŭ pli intensigis la troplenon. Komence de 1867 la fabrikistoj uzis sian kutiman elturniĝon: kvinelcentan malpliigon de la salajro. La laboristoj rezistis kaj deklaris ke la sola rimedo estas labori mallongtempe, kvar tagojn semajne; kaj ilia teorio estis la ĝusta. Post iom da hezitado la memelektitaj industri-estroj devis akcepti tiujn kondiĉojn, jen kun, jen sen kvinelcenta salajroredukto.

*Statistiko de la kotonfabrikoj de Britio en 1858, 1861 kaj 1868*

| **Nombro da fabrikoj** | **1856** | **1861** | **1868** |
|---|---|---|---|
| Anglio kaj Kimrio | 2.046 | 2.715 | 2.405 |
| Skotlando | 152 | 163 | 131 |
| Irlando | 12 | 9 | 13 |
| *Unuiĝinta Reĝlando* | 2.210 | 2.887 | 2.549 |
| | | | |
| **Nombro da vaporteksiloj** | | | |
| Anglio kaj Kimrio | 275.590 | 367.125 | 344.719 |
| Skotlando | 21.624 | 30.110 | 31.864 |
| Irlando | 1.622 | 1.757 | 2.746 |
| *Unuiĝinta Reĝlando* | 298.847 | 399.992 | 379.329 |
| | | | |
| **Nombro da ŝpiniloj** | | | |
| Anglio kaj Kimrio | 25.818.576 | 28.352.125 | 30.478.228 |
| Skotlando | 2.041.129 | 1.915.398 | 13.97.546 |
| Irlando | 150.512 | 119.944 | 124.240 |
| *Unuiĝinta Reĝlando* | 28.010.217 | 30.387.467 | 32.000.014 |
| | | | |
| **Nombro da dungitoj** | | | |
| Anglio kaj Kimrio | 341.170 | 407.598 | 357.052 |
| Skotlando | 34.698 | 41.237 | 39.809 |
| Irlando | 3.345 | 2.734 | 4.203 |
| *Unuiĝinta Reĝlando* | 379.213 | 451.569 | 401.064 |

Ĝi fariĝas la plej potenca batalilo por disbati la periodajn laboristribel-ojn, strikojn ktp kontraŭ la aŭtokrateco de la kapitalo.[243] Laŭ Gaskell la

243 „La rilato inter mastroj kaj manoj en la blovado de flintvitro kaj de botelvitro estas kronika striko." Pro tio la impeto de la manufakturo de presita vitro, kie la ĉefaj operacioj estas plenumataj de maŝinoj. Firmao apud *Newcastle*, kiu

vapormaŝino estis tuj ĉe sia komenco antagonisto de la „homforto", kiu kapabligis la kapitaliston disbati la kreskantajn pretendojn de la laboristoj kiuj minacis enkrizigi la komenciĝantan fabriksistemon.[244] Oni povus verki tutan historion de la inventoj ekde 1830, kiuj enmondiĝis nur kiel batalilo de la kapitalo kontraŭ la laboristribeloj. Ni memorigu ĉefe pri la memaganta ŝpinilo (*selfacting mule*), ĉar ĝi malfermas novan epokon de la aŭtomata sistemo.[245]

En sia deklaro antaŭ la sindikata komisiono (*Trades Unions Commission*) Nasmyth, la inventinto de la vapormartelo, raportas jene pri la plibonigoj de la maŝinoj kiujn li enkondukis sekve al la granda kaj longa striko de la maŝinlaboristoj 1851:

> „La karakteriza trajto de niaj modernaj meĥanikaj plibonigoj estas la enkonduko de memagantaj ilmaŝinoj. Tio, kion meĥanika laboristo nun devas fari, kaj kion ĉiu knabo povas fari, estas ne labori mem, sed superrigardi la belan laboron de la maŝino. La tuta klaso de laboristoj, kiuj dependas ekskluzive de sia lerteco, estas nun forigita. Antaŭe mi dungis kvar knabojn por ĉiu meĥanikisto. Danke al tiuj novaj meĥanikaj kombinaĵoj mi reduktis la nombron da plenkreskaj viroj de 1.500 al 750. La sekvo estis konsiderinda pliiĝo de mia profito."

Ure diras pri maŝino por kolorpresado en la kotonpresejoj:

> „Fine la kapitalistoj provis liberiĝi el tiu neeltenebla sklaveco (nome la por ili ĝenaj kontraktkondiĉoj de la laboristoj) per la resursoj de la scienco, kaj baldaŭ ili rehavis siajn pravajn rajtojn, tiujn de la kapo super la malsuperaj korpopartoj. En ĉiuj grandaj entreprenoj ekzistas hodiaŭ maŝinoj de kvar aŭ kvin koloroj, kiuj faras la presadon de kalikoto rapida kaj senmanka procedo."[246]

Li diras pri invento por glatigo de varpo, rekte kaŭzita de striko:

> „La bando de malkontentuloj, kiuj kredis sin nevenkeble ŝirmataj en la malnovaj tranĉeoj de la labordivido, vidis sin prenata ĉe la flankoj, kaj siajn

---

produktis antaŭe jare 350.000 funtojn da blovita flinto, produktas nun anstataŭe 3.000.500 funtojn da presita vitro. („*Child. Empl. Comm. IV. Rep.*", 1865, p. 272, 263)

244 Gaskell: „*The Manufacturing Population of England*", Londono, 1833, p. 11, 12.

245 S-ro Fairbairn inventis kelkajn tre gravajn aplikadojn de maŝinoj por konstruado de maŝinoj, sekve al strikoj en sia propra maŝinfabriko.

246 La lasta frazo el la franca versio. Kalikoto, laŭ la Reta Vortaro (ReVo), estas kotona teksaĵo, similanta tolon sed pli dika ol perkalo. -vl

> defendilojn neniigitaj per la moderna meĥanika taktiko. Ili devis senkondiĉe kapitulaci.”

Li diras pri la invento de la memaga ŝpinmaŝino:

> „Ĝi estis alvokita restarigi la ordon inter la industriaj klasoj … Tiu invento konfirmas la doktrinon jam antaŭe disvolvitan de ni, ke la kapitalo, premante la sciencon en sian servon, ĉiam devigas la ribelan manon de la laboro al obeemo.”[247]

Kvankam la verko de Ure aperis en 1835, do en la tempo de ankoraŭ relative malforte evoluinta fabriksistemo, ĝi restas la klasika esprimo de la fabrikspirito, ne nur pro sia malkaŝa cinikeco, sed ankaŭ pro la naiveco per kiu ĝi elbabilas la senpripensajn kontraŭdirojn de la kapitalcerbo. Post kiam li ekz-e disvolvas la „doktrinon”, ke la kapitalo helpe de la dungita scienco

> „ĉiam devigas la ribelan manon de la laboro al obeemo”, li indigniĝis pri tio „ke ĝi” (la fizika-meĥanika scienco) „estis akuzita ke ĝi lasas sin uzi de la riĉa kapitalisto kiel instrumenton subpremi la malriĉulojn”.[248]

Post kiam li longe predikis por montri, kiom avantaĝa por la laboristoj estas la rapida evoluo de la maŝinsistemo, li avertas ilin, ke ili per sia ribelemo, strikoj ktp rapidigas la evoluon de la maŝinoj.

> „Tiaj perfortaj ribeloj”, diras li, „montras la homan miopecon en ties plej malestiminda karaktero, la karaktero de homo kiu fariĝas sia propra torturisto.”

Kelkajn paĝojn antaŭe ni legas male:

> „Sen la akraj kolizioj kaj interrompoj, kaŭzitaj de la eraraj opinioj de la laboristoj, la fabriksistemo povintus ankoraŭ pli rapide evolui kaj multe pli utile por ĉiuj interesitaj partioj.”

Poste li denove elkrias:

> „Feliĉe por la loĝantaro de la fabrikdistriktoj de Britio la plibonigoj de la meĥaniko okazas nur iom post iom.” „Malprave”, diras li, „oni akuzas la maŝinojn ke ili malpliigas la salajron de la plenkreskuloj per tio ke ili anstataŭas parton da ili, per kio ilia nombro superas la bezonon je laboro. Sed ili pliigas la postulon de infanlaboro kaj per tio altigas *ties* salajrokvoton.”

La sama konsolisto defendas aliflanke la malaltecon de la infansalajroj per tio ke „ili malinstigas la gepatrojn sendi siajn idojn tro frue en la fabrikojn”. Lia tuta libro estas apologio de la senlima labortago, kaj ĝia

247 Ure, l.c., p. 367-370.
248 Vortigo laŭ la angla originalo. -vl

liberala animo memorigas la plej mallumajn tempojn de la mezepoko, kiam la leĝo malpermesas laborigi 13-jarajn infanojn pli ol dek-du horojn tage. Tio ne detenas lin instigi la fabriklaboristojn direkti dankpreĝon al la providenco, kiu donis al ili per la maŝinoj „la liberan tempon pensadi pri siaj senmortaj interesoj”.[249]

## 6. La kompensteorio koncerne la laboristojn anstataŭitajn de la maŝinoj

Tuta serio da burĝaj ekonomikistoj, ekz-e James Mill, MacCulloch, Torrens, Senior, J. St. Mill ktp asertas, ke ĉia maŝino kiu anstataŭas laboristojn, liberigas samtempe kaj nepre adekvatan kapitalon por dungi la samajn identajn laboristojn.[250]

Ni supozu, ke kapitalisto dungas cent laboristojn, ekz-e en tapetmanufakturo, je po 30 sterlingaj pundoj por ĉiu homo jare. La varia kapitalo elspezita de li estas do 3.000 pundoj. Li maldungu 50 laboristojn kaj laborigu la ceterajn 50 ĉe maŝino, kiu kostas al li 1.500 pundojn. Pro simpleco ni ne konsideru konstruaĵojn, karbojn ktp. Ni supozu krome, ke la ĉiujare konsumata krudmaterialo kostas nun kiel antaŭe 3.000 pundojn.[251] Ĉu per tiu metamorfozo „liberiĝis” ia ajn kapitalo? En la malnova reĝimo la elspezita totala sumo de 6.000 pundoj konsistis duone el konstanta kaj duone el varia kapitalo. Ĝi konsistas nun el 4.500 pundoj (3.000 pundoj por krudmaterialo kaj 1.500 pundoj por maŝinoj) da konstanta kaj el 1.500 pundoj varia kapitalo. Anstataŭ la duonon, la varia – aŭ en vivantan laborforton transformita – kapitalparto estas jam nur kvarono de la tuta kapitalo. Anstataŭ liberigo okazas ĉi tie ligo de kapitalo en formo, en kiu ĝi ĉesas interŝanĝiĝi kontraŭ laborforto, t.e. transformado de varia en konstantan kapitalon. La kapitalo de 6.000 pundoj povas, sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj, nun neniam dungi pli ol 50 laboristojn. Kun ĉiu plibonigo de la maŝino ĝi dungas malpli. Se la nove enkondukita maŝino kostus malpli ol la sumo de la laborforto kaj laboriloj kiujn ĝi anstataŭas, do ekz-e anstataŭ 1.500 nur 1.000 pundojn, tiam varia kapitalo de 1.000 pundoj transformiĝus en konstantan, alivorte: estus ligita, dum

249 Ure, l.c., p. 368, 7, 370, 280, 321, 281, 475.

250 Ricardo origine dividis tiun opinion, sed poste eksplicite malkonfirmis ĝin kun sia karakteriza scienca senantaŭjuĝo kaj amo al vero. Vd l.c., ĉap. XXXI „*On Machinery*”.

251 Cetere, mi donas la ilustraĵon tute en la maniero de la supre menciitaj ekonomikistoj.

kapitalo de 500 pundoj estus liberigita. Tiu lasta, se ni supozas la saman jarsalajron, konsistigas dungfonduson por proksimume dek ses laboristoj, dum kvindek estas maldungitaj, sed envere por multe malpli ol dek ses laboristoj, ĉar la 500 pundoj, por sia transformiĝo en kapitalon, siavice transformendas parte en konstantan kapitalon, do ankaŭ nur parte transformeblas en laborforton.

Tamen, eĉ se ni supozas, ke la konstruado de la nova maŝino laborigas pli grandan nombron da meĥanikistoj; ĉu tio estus kompensaĵo por la maldungitaj tapetfaristoj? En la plej bona okazo ĝia konstruado laborigas malpli da laboristoj ol ĝia uzado anstataŭas. La sumo de 1.500 pundoj, kiu konsistigis nur la salajron de la maldungitaj tepetfaristoj, konsistigas nun, en la formo de maŝinoj: 1-e la valoron de la produktadrimedoj necesaj por ĝia konstruado, 2-e la salajron de la ĝin farantaj meĥanikistoj, 3-e la plusvaloron kiu iras al ilia „mastro”. Krome: kiam la maŝino estas produktita, ĝi ne bezonas esti renovigita ĝis post sia morto. Do, por konstante laborigi la kroman nombron da meĥanikistoj, unu tapetfabrikisto post la alia devas anstataŭigi laboristojn per maŝinoj.

Fakte tiuj apologiistoj ja ankaŭ ne celas tiun specon de liberigo de kapitalo. Ili celas la vivrimedojn de la maldungitaj laboristoj. Oni ne povas nei, ke en la supra kazo ekz-e la maŝino ne nur „liberigas” 50 laboristojn kaj faras ilin disponeblaj por aliuloj, sed ĝi samtempe nuligas ilian rilaton kun la vivrimedoj en la valoro de 1.500 pundoj kaj tiel „liberigas” tiujn vivrimedojn. La simpla kaj tute ne nova fakto, ke la maŝino „liberigas” la laboriston de vivrimedoj esprimiĝas en ekonomia lingvo tiel ke la maŝino liberigas vivrimedojn por la laboristo aŭ transformas ilin en kapitalon por lia dungo. Oni vidas, ke ĉio dependas de la esprimmaniero. Decas mildigi la fiaĵon per vortoj.[252]

Laŭ tiu teorio la vivrimedoj je valoro de 1.500 sterlingaj pundoj estis kapitalo plivalorigita de la laboro de la kvindek maldungitaj laboristoj. Tiu kapitalo sekve perdas sian taskon, ekde kiam tiuj kvindek ferias, kaj ne ripozas ĝis ĝi trovas novan „investon”, per kiu tiuj kvindek ree povas produktive konsumi ĝin. Pli aŭ malpli frue kapitalo kaj laboristoj devas do ree kuniĝi, kaj tiam okazas la kompenso. La suferoj de la laboristoj anstataŭigitaj de la maŝinoj estas do same pasemaj kiel la riĉaĵoj de tiu ĉi mondo.

La vivrimedoj en valoro de 1.500 sterlingaj pundoj neniam alfrontis la laboristojn kiel kapitalo. Kio alfrontis ilin kiel kapitalo, tio estis la nun en

252 *Originale en la latina: Nominibus mollire licet mala*. -vl

maŝinojn transformitaj 1.500 pundoj. Ĉe pli detala rigardo, tiuj 1.500 pundoj prezentas nur parton de la tapetoj jare produktitaj de la nun maldungitaj kvindek laboristoj, kiun ili ricevis en monformo anstataŭ en natura formo de sia mastro kiel salajro. Per la tapetoj transformitaj en 1.500 sterlingaj pundoj ili aĉetis vivrimedojn je la sama sumo. Tiuj ekzistis por ili do ne kiel kapitalo, sed kiel varoj, kaj ili mem ekzistis por tiuj varoj ne kiel dunglaboristoj, sed kiel aĉetantoj. La cirkonstanco, ke la maŝino „liberigis" ilin je aĉetrimedoj, transformas ilin el aĉetantoj en neaĉetantojn. Pro tio okazas malpli da postulo por tiuj varoj. Jen ĉio. Se tiu malaltigita postulo ne kompensiĝas per pli da postulo el alia flanko, tiam la merkatprezo de la varoj malpliiĝas. Se tio daŭras pli longe kaj iom amplekse, tiam sekvas delokado de la laboristoj okupataj en la produktado de tiuj varoj. Parto de la kapitalo, kiu antaŭe produktis necesajn vivrimedojn, estas reproduktata en alia formo. Dum la falo de la merkatprezoj kaj la delokiĝo de kapitalo ankaŭ la laboristoj okupataj en la produktado de necesaj vivrimedoj estas „liberigataj" de parto de sia salajro. Do, anstataŭ pruvi, ke la maŝinoj per „liberigo" de la laboristoj je vivrimedoj transformas tiujn lastajn samtempe en kapitalon por dungi la unuajn, la sinjoro apologiisto pruvas per la ĉiam preta leĝo de postulo kaj propono, ke la maŝinoj senlaborigas laboristojn ne nur en la produktadbranĉo, en kiu ĝi estas enkondukita, sed ankaŭ en tiuj produktadbranĉoj, en kiuj ĝi ne estas enkondukita.

La realaj faktoj, transvestitaj de la ekonomia optimismo, estas jenaj: La laboristoj anstataŭitaj de la maŝino estas elĵetitaj el la laborejo kaj alĵetitaj sur la labormerkaton kaj tie pliigas la nombron da laborfortoj jam disponeblaj por kapitalisma ekspluatiĝo. En la sepa sekcio montriĝos, ke tiu efiko de la maŝinoj, kiu estas ĉi tie prezentata al ni kiel kompensaĵo por la laborista klaso, male trafas la laboriston kiel plej terura skurĝo. Ĉi tie nur la jenon: La laboristoj elĵetitaj el industria branĉo povas ja serĉi dungon en alia industribranĉo. Se ili trovas ion tian, kaj se per tio la ligo inter ili kaj la kun ili „liberigitaj" vivrimedoj renodiĝas, tiam tio okazas per nova, aldona kapitalo kiu serĉas investon, sed tute ne per la jam antaŭe funkcianta kapitalo kiu estas nun transformita en maŝinojn. Kaj eĉ tiukaze, kiom malmulte da perspektivoj ili havas! Kripligitaj de la labordivido, tiuj kompatinduloj valoras ekster sia malnova laborkampo tiom malmulte, ke ili trovas aliron nur en malmultaj laborbranĉoj primitivaj kaj do malbone pagataj kun konstante tro da kandidatoj.[253] Krome, ĉiu indu-

253 Ricardo-ano rimarkigas pri tio kontraŭ la tedaĵoj de J. B. Say: „Kiam la labordivido estas evoluinta, la lerteco de la laboristoj aplikeblas nur en la

stribranĉo altiras ĉiujare novan homfluon, kiu liveras al ĝi ĝian kontingenton por regula anstataŭigo kaj kresko. Ekde kiam la maŝinoj „liberigas” parton de la ĝis nun dungitaj laboristoj en iu industribranĉo, ankaŭ la novaj rezervuloj estas alie dismetitaj kaj sorbataj en aliaj laborbranĉoj, dum la originaj viktimoj en la transira tempo grandparte senmoraliĝas kaj kadukiĝas.

Estas nekontestebla fakto, ke la maŝinaro mem ne respondecas pri la „liberigo” de la laboristoj je vivrimedoj. Ĝi malplikostigas kaj pliigas la produkton en la branĉo kiun ĝi alprenas, kaj lasas la kvanton da vivrimedoj produktataj en aliaj industribranĉoj unue senŝanĝa. Nun kiel antaŭ ĝia enkonduko la socio posedas do same multajn aŭ pliajn vivrimedojn por la delokitaj laboristoj, tute sendepende de la grandega parto de la jara produkto kiu estas malŝparata de nelaboristoj. Kaj en tio sidas la pinto de la ekonomika apologio! La kontraŭdiroj kaj antagonismoj nedisigeblaj de la kapitalisma aplikado de la maŝino ekzistas ne ĉar ili elkreskas el la maŝino mem, sed el ĝia kapitalisma aplikado! Ĉar do la maŝino, konsiderata kiel tia, mallongigas la labortempon, dum ĝi kapitalisme aplikata longigas la labortagon, konsiderata kiel tia faciligas la laboron, kapitalisme aplikata altigas ĝian intenson, konsiderata kiel tia estas venko de la homo super la naturforto, kapitalisme aplikata subjugas la homon per la naturforto, konsiderata kiel tia pliigas la riĉaĵon de la produktanto, kapitalisme aplikata paŭperigas lin ktp, pro tio la burĝa ekonomikisto simple deklaras ke la konsiderado de la maŝino kiel tia pruvas precize ke ĉiuj ĉi palpeblaj kontraŭdiroj estas nura ŝajno de la ordinara realeco, sed kiuj en la realo, do ankaŭ en la teorio, tute ne ekzistas. Tiel li ŝparas al si ĉian plian kaprompiĝon kaj krome deklaras implicite sian kontraŭulon sufiĉe stulta ke li atakas ne la kapitalisman uzadon de la maŝino sed la maŝinon mem.

La burĝa ekonomikisto tute ne neas ke ĉe tio okazas ankaŭ dumtempaj ĝenoj; sed kie ekzistas tia medalo sen dorsa flanko! Alia ol kapitalisma uzado de la maŝinoj estas por li neebla. Ekspluatado de la laboristo pere de la maŝino estas por li identa kun ekspluatado de la maŝino per la laboristo. Kiu do malkaŝas la realan staton de la kapitalisma uzado de la maŝinoj, tiu tute ne volas ilian uzadon, tiu kontraŭas la socian

---

aparta branĉo en kiu ili estis instruitaj; ili mem estas speco de maŝinoj. Servas do al nenio papage gurdi ke la aferoj havas tendencon trovi sian nivelon. Ni devas rigardi ĉirkaŭ ni kaj vidi ke ili por longa tempo ne povas trovi sian nivelon; ke, se ili trovas ĝin, la nivelo estas malpli alta ol komence de la procezo.” („*An Inquiry into those Principles Respecting the Nature of Demand etc.*”, Londono, 1821, p. 72)

progreson![254] Precize la rezonado de la fama rabmurdisto Bill Sikes:

> „Sinjoroj ĵurianoj, sendube la gorĝo de tiu vojaĝanta komizo estis tranĉita. Sed pri tio ne kulpas mi, kulpas la tranĉilo. Ĉu pro tiaj dumtempaj ĝenoj ni forigu la uzadon de la tranĉilo? Pripensu bone! Kie estus kampkulturado kaj metio sen tranĉilo? Ĉu ĝi ne estas same bonfara en ĥirurgio kiel scia en anatomio? Krome servopreta helpanto ĉe festa tablo? Se vi forigas la tranĉilon – vi reĵetas nin en la plej profundasn barbarecon."[255]

Kvankam la maŝinoj nepre anstataŭas laboristojn en la laborbranĉoj en kiuj ili estas enkondukataj, ili povas tamen kaŭzi pliiĝon de dungoj en aliaj laborbranĉoj. Sed tiu efiko havas nenion komunan kun la tiel nomata kompensteorio. Ĉar ĉia maŝinprodukto, ekz-e ulno da maŝinteksaĵo, estas malpli kosta ol la samspeca manprodukto kiun ĝi anstataŭas, sekvas kiel absoluta leĝo: Se la totala kvanto de la maŝine produktita artiklo egalas la totalan kvanton de la artiklo produktita metie aŭ manufakture kaj anstataŭata de ĝi, tiam la totala sumo de aplikita laboro malpliiĝas. La plia laboro, necesa ekz-e por produktado de la laborrimedoj mem, de la maŝinoj, karbo ktp, devas esti malpli granda ol la malpliigo de la laboro kiun kaŭzas la aplikado de la maŝinoj. Alie la maŝinprodukto estus same kosta kiel la manprodukto. Sed anstataŭ resti sama, la totala kvanto de maŝinartiklo produktata de malpli granda nombro da laboristoj fakte kreskas multe super la totala kvanto de la anstataŭita metia artiklo. Ni supozu, ke 400.000 ulnoj da maŝinteksaĵo estas produktataj de malpli da laboristoj ol 100.000 ulnoj da manteksaĵo. En la kvaroble pli granda produkto kuŝas kvaroble pli da krudmaterialo. La produktado de la krudmaterialo devas do kvarobliĝi. Sed koncerne la konsumataj laborrimedoj, ekz-e konstruaĵoj, karbo, maŝinoj ktp, la limo, ene de kiu la laboro necesa por ilia produktado povas kreski, ŝanĝiĝas kun la diferenco inter la kvanto de la maŝinprodukto kaj la kvanto de la manprodukto produktebla de la sama nombro da laboristoj.

---

254 Virtuozo en tiu aroga kretenismo estas i.a. MacCulloch. „Se estas avantaĝe, diras li ekz-e kun la afekta naiveco de 8-jara infano, pli kaj pli disvolvi la lertecon de la laboristo, tiel ke li kapablas produkti ĉiam kreskantan kvanton da varoj per la sama aŭ malpli granda laborkvanto, tiam devas esti ankaŭ avantaĝe ke li uzu tiajn maŝinojn por lia apogo, kiuj helpos lin plej efike por atingi tiun rezulton." (MacCulloch: *„Princ. of Pol. Econ."*, Londono, 1830, p. 166)

255 „La inventinto de la ŝpinmaŝino ruinigis Hindion, kio tamen ne multe tuŝas nin." A. Thiers: *„De la Propriété*", [p. 275]) S-ro Thiers konfuzas ĉi tie la ŝpinmaŝinon kun la meĥanika teksilo, „kio tamen ne multe tuŝas nin".

Kun la disvastiĝo de la maŝinsistemo en industribranĉo do unue kreskas la produktado en la aliaj branĉoj, kiuj liveras al ĝi ĝiajn produktadrimedojn. Kiom la kvanto de dungitaj laboristoj per tio kreskas, dependas, kun donitaj longo de la labortago kaj intenso de la laboro, de la konsisto de la aplikataj kapitaloj, t.e. de la proporcio de ilia konstantaj kaj variaj partoj. Tiu proporcio siavice tre varias kun la amplekso, per kiu la maŝinoj jam enpenetris aŭ enpenetras la koncernajn metiojn. La nombro da homoj kondamnitaj al karb- kaj metal-minejoj ege ŝvelis kun la progreso de la angla maŝinsistemo, kvankam ĝia kresko en la lastaj jardekoj pro la uzado de novaj maŝinoj por minado malrapidiĝis.[256] Nova speco de laboristoj naskiĝas kun la maŝino, ĝia produktanto. Ni scias jam, ke la maŝinsistemo etendiĝas al tiu produktadbranĉo mem ĉiam pli grandskale.[257] Koncerne la krudmaterialon[258], estas nenia dubo ke ekz-e la rapidmarŝo de la kotonŝpinado forceje helpis la kotonkulturadon de Usono kaj kun tiu ne nur la afrikan sklavkomercon, sed samtempe faris la bredadon de nigruloj ĉefa komerco de la tiel nomataj lim-sklavŝtatoj. Kiam en 1790 okazis la unua cenzo de sklavoj en Usono, ilia nombro estis 697.000, sed en 1861 proksimume kvar milionoj. Aliflanke ne estas malpli certe, ke la ekflorado de la meĥanika lanfabriko kun la iom-postioma transformado de kampgrundo en ŝafpaŝtejon kaŭzis la amasan forpeladon kaj „superfluigon” de kamplaboristoj. Irlando trairas ankoraŭ ĉi-momente tiun procezon, nome ke ĝia loĝantaro depost 1845 preskaŭ duone reduktita estas daŭre kaj preme reduktata al la mezuro kongrua kun la bezono de ĝiaj grundproprietuloj kaj de la anglaj sinjoroj lanfabrikistoj.

Se la maŝinsistemo etendiĝas al antaŭaj kaj interaj ŝtupoj kiujn laborobjekto devas trairi ĝis sia lasta formo, tiam kun la labormaterialo pliiĝas la laborpostulo en la ankoraŭ metiaj aŭ manufakturaj branĉoj, en kiujn la

256 Laŭ la cenzo de 1861 (vol. II, Londono, 1863) la nombro da en la karbminejoj de Anglio kaj Kimbrio okupataj laboristoj estis 246.613, el kiuj 73.546 sub kaj 173.067 super 20-jaraj. Al la unua rubriko apartenas 835 kvin- ĝis dek-jaruloj, 30.701 dek- ĝis dekkvin-jaruloj, 42.010 dekkvin- ĝis deknaŭ-jaruloj. La nombro da dungitoj en fer-, kupro-, plumb-, stan- kaj aliaj metal-minejoj: 319.222.

257 En Anglio kaj Kimrio estis 1861 dungitaj en la produktado de maŝinoj: 60.807 personoj, inkluzive de la fabrikistoj kune kun siaj komizoj ktp, same ĉiuj agentoj kaj komercistoj en tiu fako. Sed ekskluditaj estis la produktistoj de pli grandaj maŝinoj, ekz-e kudromaŝinoj ktp, same kiel la produktistoj de la iloj por la labormaŝinoj, ekz-e ŝpiniloj ktp. La nombro da ĉiuj civilinĝenieroj estis 3.329.

258 Ĉar fero estas unu el la plej gravaj krudmaterialoj, ni rimarkigu ĉi tie, ke 1861 en Anglio kaj Kimrio estis 125.771 fergisistoj, el kiuj 123.430 viraj, 2.341 inaj. El la unuaj estis 30.810 sub kaj 92.620 super la aĝo de 20 jaroj.

produktita maŝino eniras. Ekzemple la maŝinŝpinejoj liveris la fadenon tiom malmultekoste kaj tiom abunde, ke la manteksistoj povis unue, sen plia elspezo, labori plentempe. Tiel ilia enspezo kreskis.[259] Tial okazis homalfluo en la kotonteksadon, ĝis kiam fine la 800.000 kotonteksistoj naskitaj ekzemple de *Jenny*, *throstle* kaj *mule* en Anglio, estis pereigitaj de la vaporteksilo. Same kreskas kun la abundo de maŝine produktataj ŝtofoj la nombro da tajloroj, robfaristinoj, kudristinoj ktp, ĝis kiam aperas la kudromaŝino.

Proporcie al la kreskanta kvanto da krudmaterialoj, duonfabrikaĵoj, laboriloj ktp, kiujn la maŝinsistemo liveras kun relative malalta nombro da laboristoj, la prilaborado de tiuj krudmaterialoj kaj duonfabrikaĵoj dividiĝas en sennombrajn subspecojn, kreskas do la diverseco de la sociaj produktadbranĉoj. La maŝinsistemo pelas la socian labordividon senkompare pli antaŭen ol la manufakturo, ĉar ĝi en senkompare pli alta grado pliigas la produktivon de la metioj kiujn ĝi akaparas.

La sekva rezulto de la maŝinsistemo estas pligrandigi la plusvaloron kaj samtempe la produktkvanton en kiu ĝi prezentiĝas, do kun la substanco, el kiu la klaso de kapitalistoj kune kun sia anaro nutras sin, tiujn sociajn tavolojn mem. Ilia kreskanta riĉaĵo kaj la konstante malkreskanta nombro da laboristoj necesaj por la produktado de la unuaj vivrimedoj produktas kun novaj luksaj bezonoj samtempe novajn rimedojn por kontentigi ilin. Pli granda parto de la socia produkto transformiĝas en plusprodukton kaj pli granda parto de la plusprodukto estas reproduktata kaj konsumata en pli fajnigitaj kaj pli variaj formoj. Per aliaj vortoj: La produktado de luksaĵoj kreskas.[260] La fajnigo kaj diversigo de la produktoj fontas same el la novaj mondmerkataj rilatoj, kiujn la granda industrio kreas. Ne nur interŝanĝiĝas pli da eksterlandaj frandaĵoj kontraŭ la hejma produkto, sed ankaŭ pli granda kvanto da fremdaj krudmaterialoj, ingrediencoj, duonfabrikaĵoj ktp eniras kiel produktadrimedoj en la hejman industrion. Kun tiuj mondmerkataj rilatoj kreskas la postulo de laboro en la transport-

259 „Familio el kvar plenkreskuloj (kotonteksistoj), kun du infanoj por bobenigi, gajnis fine de la lasta *[18-a]* kaj komence de la nuna *[19-a]* jarcento kvar sterlingajn pundojn en semajno per 10-hora laboro tage. Kiam la laboro urĝis, ĝi povis gajni eĉ pli. Antaŭe ili ĉiam suferis mankantan fadenprovizon.” (Gaskell, l.c., p. 34, 35)

260 Frederiko Engelso en „*Lage usw* [Situacio ktp] <vidu MEW, vol. 2> atestas pri la mizera stato de granda parto de ĝuste tiuj lukslaboristoj. Amaso da novaj atestoj pri tio troviĝas en la raportoj de la „*Child. Empl. Comm.*”

industrio kaj tiu fendiĝas en sennombrajn novajn subspecojn.[261]

La pliiĝo de produktad- kaj viv-rimedoj ĉe relative malkreskanta nombro da laboristoj instigas al etendo de la laboro en industribranĉoj, kies produktoj, ekz-e kanaloj, vardokoj, tuneloj, pontoj ktp, portas siajn fruktojn nur en malproksima estonteco. Elformiĝas, ĉu rekte surbaze de la maŝinsistemo, ĉu de la ĝenerala industria revolucio kiu respondas al ĝi, tute novaj produktadbranĉoj kaj do novaj laborkampoj. Sed la spaco kiun ili okupas en la totala produktado ne estas tre granda, eĉ en la plej evoluintaj landoj. La nombro da laboristoj dungitaj de ili kreskas en rekta proporcio en kiu ili rekreas la postulon de plej kruda manlaboro. Kiel ĉefaj industrioj de tiu speco konsidereblas nuntempe gasfabrikoj, telegrafio, fotografio, vaporŝipoj kaj fervojoj. La nombrado de 1861 (por Anglio kaj Kimrio) montras en la gasindustrio (gasfabrikoj, produktado de la meĥanikaj aparatoj, agentoj de la gaskompanioj ktp) 16.211 personojn, en telegrafio 2.399, en fotografio 2.366, en vaporŝipaj servoj 3.570 kaj fervojoj 70.599, el kiuj proksimume 18.000 estas pli aŭ malpli konstante dungitaj „nelertaj” terlaboristoj kune kun la tuta administra kaj komerca personaro. Do la tuta nombro da individuoj en tiuj kvin novaj industrioj estas 94.145.

Fine la eksterordinare altigita produktivo en la sferoj de la granda industrio, akompanata de pli alta ekspluatado intensa kaj malintensa de la laborforto en ĉiuj ceteraj produktadsferoj, ebligas uzi ĉiam pli grandan parton de la laborista klaso neproduktive kaj tiel ĉiam pli amase reprodukti la malnovajn domsklavojn sub la nomo de „servanta klaso”, ekz-e servistoj, ĉambristinoj, lakeoj ktp. Laŭ la popolnombrado de 1861 la tuta loĝantaro de Anglio kaj Kimrio estis 20.066.225 personoj, el kiuj 9.776.259 viraj kaj 10.289.965 inaj. Se oni dekalkulas tiujn kiuj estas tro maljunaj aŭ tro junaj por laboro, ĉiujn „neproduktivajn” virinojn, junajn personojn kaj infanojn, poste la „ideologiajn” klasojn, ekzemple registaron, pastrojn, juristojn, militistojn ktp, krome ĉiujn kies ekskluziva okupiĝo estas konsumo de fremda laboro en formo de grundrento, interezo ktp, fine mizerulojn, vagabondojn, krimulojn ktp, tiam restas proksimume ok milionoj de ambaŭ seksoj kaj plej diversaj aĝoj, inkluzive de ĉiuj iel en produktado, komerco financsistemo ktp funkciantaj kapitalistoj. El tiuj ok milionoj estas: *(vidu sur la sekva paĝo)*

Se ni sumigas la dungitojn en ĉiuj teksaĵaj fabrikoj kune kun la personaron de la karb- kaj metal-minejoj, tio rezultigas 1.208.442; se ni sumigas

261 En la jaro 1861 estis en Anglio kaj Kimrio 94.665 maristoj dungitaj ĉe la komerca ŝiparo.

ilin kun la personaro de ĉiuj metalfabrikoj kaj manufakturoj, tiam la tuta nombro estas 1.039.605, en ambaŭ kazoj pli malgranda ol la nombro de la modernaj domsklavoj. Kia edifa rezulto de la kapitalisme ekspluatata maŝinsistemo!

## 7. Reĵeto kaj altiro de laboristoj kun evoluo de la maŝinsistemo. Krizoj de la kotonindustrio

Ĉiuj seriozaj reprezentantoj de la politika ekonomio koncedas ke la nova enkonduko de maŝinoj efikas peste sur la laboristoj en la tradiciaj metioj kaj manufakturoj, kun kiuj ĝi unue konkurencas. Preskaŭ ĉiuj ĝemas pro la sklaveco de la fabriklaboristo. Kaj kiu estas la granda atuto kiun ili metas en la batalon? Tiu, ke la maŝinsistemo, post la teruraĵoj de la periodo de sia enkonduko kaj disvolviĝo, lastinstance pliigas la labor-sklavojn anstataŭ malpliigi ilin! Ja la politika ekonomio jubilas pri la fia teoremo, fia por ĉia „homamanto” kiu kredas je la eterna naturneceso de la kapitalisma produktadmaniero, ke eĉ la fabriko jam bazita

***Nombro da personoj laborantaj en diversaj branĉoj***

| | ***personoj*** |
|---|---|
| Kamplaboristoj (inkluzive de paŝtistoj kaj kamp-geservistoj loĝantaj ĉe farmistoj) | 1.098.261 |
| Ĉiuj en koton-, lan-, glatdrap-, lin- sisal-, silk-, jut-fabrikoj kaj en la meĥanika ŝtrumptrikado kaj puntfabrikado dungitaj personoj | 642.607[262] |
| Ĉiuj en karb- kaj metal-minejoj dungitaj personoj | 565.835 |
| Ĉiuj dungitoj en ĉiuj metalfabrikoj (altfornoj, lam-inejoj ktp) kaj ĉiaj en metalmanufakturoj dungitoj | 396.998[263] |
| Servanta klaso | 1.208.648[264] |

262 El ili nur 177.596 viraj pli ol 13-jaraj.

263 El ili inaj: 30.501.

264 El ili viraj: 137.447. El tiuj 1.208.648 estas ĉia personaro kiu ne servas en privataj domoj. – *Aldono al la 2-a eld.:* De 1861 ĝis 1870 la nombro de viraj

sur la maŝinsistemo, post ia periodo de kresko, post pli aŭ malpli longa „transira tempo", labore turmentas pli da laboristoj ol ĝi origine elĵetis![265]

Estas vere ke en kelkaj kazoj, kiel ni vidis ĉe kelkaj ekzemploj de la anglaj glatdrap- kaj silk-fabrikoj, ke sur certa evoluŝtupo eksterordinara etendiĝo de fabrikbranĉoj povas esti ligita ne nur kun relativa, sed absoluta malpliigo de la nombro da uzataj laboristoj. En la jaro 1860, kiam speciala nombrado de ĉiuj fabrikoj de la Unuiĝinta Reĝlando okazis laŭ ordono de la parlamento, la departemento – atribuita al la fabrikinspektisto R. Baker – de la fabrikdistriktoj de Lankaŝiro, Ĉeŝiro kaj Jorkŝiro nombris 652 fabrikojn; el tiuj, 570 havis 85.622 vaporteksilojn, 6.819.156 ŝpinilojn (kun ekskludo de duobligaj ŝpiniloj), 27.439 ĉevalpovojn en vapormaŝinoj, 1.390 en akvoradoj, dungis 94.119 personojn. En la jaro 1865, male, la samaj fabrikoj havis: 95.163 teksilojn, 7.025.031 ŝpinilojn, 28.925 ĉevalpovojn en vapormaŝinoj, 1.445 en akvoradoj, dungis 88.913 personojn. De 1860 ĝis 1865 la pliigo en tiuj fabrikoj estis do da vaporteksiloj 11 elcentoj, da ŝpiniloj 3 elcentoj, da vaporĉevalpovo 5 elcentoj, dum samtempe la nombro da dungitaj personoj malkreskis je

servistoj preskaŭ duobliĝis. Ĝi kreskis al 267.671. En la jaro 1847 ekzistis 2.694 ĉasgardistoj (por la aristokrataj parkoj kaj sovaĝbestejoj), sed en 1869 ekzistis 4.921. – La junaj knabinoj servantaj ĉe la anoj de la londona malsupra meza klaso estas nomataj en la popola lingvo *littles slaveys*, sklavetoj.

265 Ganilh, male, opinias kiel finan rezulton de la maŝinsistemo absolute malpli grandan nombron da laborsklavoj, sur kies kostoj tiam pli granda nombro da „decaj homoj" konsumas kaj disvolvas sian konatan „perfektigeblan perfektecon". Kvankam li apenaŭ komprenas la moviĝon de la produktado, li almenaŭ sentas, ke la maŝinsistemo estas tre fatala institucio, se ĝia enkonduko transformas laborantajn laboristojn en mizerulojn, dum ĝia evoluo naskas pli da laborsklavoj ol ĝi forigis. La kreteneco de lia propra starpunkto esprimeblas nur per liaj propraj vortoj: „La klasoj, kiuj estas kondamnitaj produkti kaj konsumi, malpliiĝas, kaj la klasoj kiuj gvidas la laboron, alportas al la tuta loĝantaro mildigon, konsolon kaj komprenon, pliiĝas … kaj alproprigas al si ĉiujn avantaĝojn kiuj rezultas el la malpliiĝo de la laborkostoj, el la abundo de varoj kaj el la malalta prezo de la konsumvaroj. Sub tiu gvidado la homaro leviĝas al la plej altaj kreaĵoj de la genio, penetras la misterajn profundojn de la religio, starigas la bonfarajn principojn de la moralo" (kiu konsistas en tio, „alproprigi al si ĉiujn avantaĝojn ktp"), „la leĝojn por protekti la liberecon" (ĉu la liberecon por „la klasoj kondamnitaj produkti"?) kaj *[la leĝojn]* de la potenco, de la obeo kaj de la justeco, de la devo kaj de la humaneco." Tiu galimatio troviĝas jene: „*Des Systèmes d'Économie Politique etc*." *Par M. Ch. Ganilh, 2ème éd.*, Parizo, 1821, vol. I, p. 225, kp p. 212.

5,5 elcentoj.[266] Inter 1852 kaj 1862 okazis konsiderinda kresko de la angla lanfabrikado, dum la nombro da aplikataj laboristoj restis preskaŭ sama.

> „Tio montras, en kiom granda mezuro nove enkondukitaj maŝinoj forigis la laboron de antaŭaj periodoj."[267]

En kelkaj okazoj la pliiĝo de la dungitaj fabriklaboristoj estas nur ŝajna, do ĝi ne okazis pro etendiĝo de fabriko kiu jam baziĝis sur la maŝinsistemo, sed pro la iom-post-ioma aneksado de flankaj branĉoj, ekzemple la pliiĝo, de 1838 ĝis 1858, de meĥanikaj teksiloj kaj de la fabriklaboristoj laborantaj ĉe ili, okazis en la (brita) kotonfabriko simple pro la etendiĝo de tiu komerca branĉo; en la aliaj fabrikoj, male, la enkonduko de vaporforto por la tapiŝ-, ruband-, lin-teksilo ktp, kiuj estis antaŭe movataj de homa muskolforto.[268] La pliiĝo de tiuj fabriklaboristoj estis do nur la esprimo de malpliiĝo en la tuta nombro da dungitaj laboristoj. Fine tiu demando estis tie traktata tute aparte de la fakto, ke ĉie, kun escepto de la metalfabrikoj, la fabrikpersonaro konsistas plejparte el junulaj laboristoj (malpli ol 18-jaraj), virinoj kaj infanoj.

Oni tamen komprenas, spite al la kvanto da laboristoj fakte elpuŝitaj kaj virtuale anstataŭitaj, kiel per sia propra kresko, esprimita en pli da samspecaj fabrikoj aŭ la etenditaj dimensioj de ekzistantaj fabrikoj, la fabriklaboristoj povas fine esti pli multnombraj ol la manufakturlaboristoj aŭ metiistoj kiujn ili anstataŭis. Ni supozu ekz-e ke la semajne aplikata kapitalo de 500 sterlingaj pundoj konsistas ekz-e en la malnova sistemo el du kvinonoj da konstanta kaj tri kvinonoj da varia partoj, do 200 pundoj elspeziĝas por produktadrimedoj, 300 pundoj por laborforto, ni diru po 1 pundo por ĉiu laboristo. Kun la maŝinsistemo la konsisto de la tuta

266„*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*", p. 58 sj. Sed samtempe jam ekzistis la materia bazo por dungo de kreskanta nombro da laboristoj en 110 novaj fabrikoj kun 11.625 vaporteksiloj, 628.576 ŝpiniloj, 2.695 vapor- kaj akvo-ĉevalpovo. (saml.)

267„*Reports etc. for 31st Oct. 1862*", p. 79.

*Aldono al la 2-a eld.:* Fine de decembro 1871 la fabrikinspektisto A. Redgrave diris en prelego, farita en Bradfordo, en la *„New Mechanics' Institution":* „Kio mirigis min de iom da tempo, tio estis la ŝanĝita aspekto de la lanfabrikoj. Antaŭe ili estis plenaj de virinoj kaj infanoj, nun la maŝinoj ŝajnas fari ĉian laboron. Laŭ demando, fabrikisto donis al mi sekvan klarigon: Sub la malnova sistemo mi laborigis 63 personojn; post enkonduko de pli bonaj maŝinoj mi reduktis miajn manojn al 33, kaj lastatempe, sekve al novaj grandaj ŝanĝoj, mi kapablis redukti ilin de 33 al 13."

268„*Reports etc. for 31st Oct. 1856*", p. 16.

kapitalo ŝanĝiĝas. Ĝi konsistas nun ekz-e el 4 kvinonoj da konstanta kaj unu kvinono el varia partoj, aŭ jam nur 100 pundoj elspeziĝas por laborforto. Du trionoj de la antaŭe dungitaj laboristoj estas do maldungitaj. Se tiu fabriksistemo etendiĝas kaj la aplikata tuta kapitalo kreskas kun alie senŝanĝaj produktadkondiĉoj de 500 al 1.500, tiam nun okupiĝas 300 laboristoj, tiom multe kiom antaŭ la industria revolucio. Se la aplikata kapitalo kreskas plu al 2.000, tiam 400 laboristoj okupiĝas, do triono pli ol per la malnova sistemo. La nombro da laboristoj kreskis absolute je cent, sed relative, t.e. en la proporcio al la antaŭpagita kapitalo, ĝi malkreskis je 800, ĉar la kapitalo de 2.000 pundoj dungus en la malnova sistemo 1.200 anstataŭ 400 laboristojn. Relativa malpliiĝo de la nombro de dungitaj laboristoj do harmonias kun ĝia absoluta pliiĝo. Supre ni supozis, ke kun la kresko de la tuta kapitalo ties konsisto restas konstanta, ĉar la produktadkondiĉoj restas konstantaj. Sed oni scias jam, ke kun ĉia progreso de la maŝinsistemo la konstanta kapitalparto, konsistanta el maŝinoj, krudmaterialo ktp, kreskas, dum la varia, por laborforto elspezita, malkreskas, kaj oni scias samtempe, ke en nenia alia sistemo la plibonigo estas tiom konstanta, do ke la konsisto de la tuta kapitalo estas tiom varia. Sed tiu konstanta ŝanĝo estas same konstante interrompata de ripozaj momentoj kaj de nur kvanta etendiĝo sur donita teĥnika bazo. Per tio la nombro da okupataj laboristoj kreskas. Ekz-e la nombro de ĉiuj laboristoj en la koton-, lan-, glatdrap-, lin- kaj silk-fabrikoj de la Unuiĝinta Reĝlando estis en 1835 nur 354.684, dum en 1861 sole la nombro da vaporteksistoj (ambaŭseksaj kaj de plej diversaj aĝoj ekde la 8-a vivojaro) estis 230.654. Tamen tiu kresko ŝajnas malpli granda, se konsideri ke la britaj kotonteksistoj kun la familioj de ili mem laborigataj nombris en 1838 ankoraŭ 800.000[269], tute sendepende de tiuj forpuŝitaj en Azio kaj sur la eŭropa kontinento.

En la malmultaj rimarkigoj ankoraŭ farendaj pri tiu punkto ni tuŝas parte pure faktajn kondiĉojn, al kiuj nia teoria prezentado mem ankoraŭ ne kondukis.

Tiom longe, kiom la maŝinsistemo etendiĝas en industribranĉo surkoste de la tradicia metio aŭ de la manufakturo, ĝiaj sukcesoj estas tiom certaj

269 „La suferoj de la manteksistoj" *(de kotono kaj de materialoj miksitaj kun kotono)* „estis celo de la esplorado per reĝa komisiono, sed kvankam ilia mizero estis agnoskita kaj lamentita, oni lasis la plibonigon *(!)* de ilia situacio al la hazardo kaj al la ŝanĝo de la tempo, kaj oni rajtas esperi, ke tiuj suferoj nun *(20 jarojn poste!)* preskaŭ estingiĝis , al kio la nuna granda etendiĝo de la vaporteksiloj plej verŝajne kontribuis." („*Rep. Insp. Fact., 31st Oct. 1856*", p. 15)

kiom ekzemple la sukceso de armeo armita per prajmofusiloj kontraŭ armeo de arkpafistoj. La unua periodo, dum kiu la maŝino nur konkeras sian agokampon, estas decide grava pro la eksterordinaraj profitoj kiujn ĝi helpas produkti. Tiuj ne nur konsistigas per si mem fonton de akcelita akumulado, sed krome altiras en la favoratan produktadsferon grandan parton de la socia aldona kapitalo, kiu estas konstante nove estigata kaj kiu konstante strebas al nova investiĝo. La apartaj avantaĝoj de la unua periodo de febra aktiveco ripetiĝas konstante en la produktadbranĉoj en kiuj la maŝinoj estas nove enkondukataj. Sed ekde kiam la fabriksistemo akiris certan dimension kaj certan gradon de matureco, speciale ekde kiam ĝia propra teĥnika bazo, la maŝinoj, estas siavice produktataj de maŝinoj, ekde kiam la produktado de karbo kaj fero kaj la prilaborado de metaloj kaj la transportsistemo estas revoluciigitaj kaj entute la ĝeneralaj produktadkondiĉoj kongruaj kun la granda industrio estiĝis, tiam la maŝinsistemo akiras elastecon, subitan kapablon adaptiĝi, kiuj trovas siajn limojn nur en la krudmaterialo kaj en la vendmerkato. La maŝinsistemo kaŭzas unuflanke rektan pliigon de la krudmaterialo, kiel ekz-e la koton-sen-semigilo pliigis la produktadon de kotono. [270] Aliflanke malkareco de la maŝinprodukto kaj la revoluciigita transport- kaj komunik-sistemo estas armiloj por konkeri fremdajn merkatojn. Per ruinigo de ties metieca produkto la maŝinsistemo transformas ilin nepre en produktadkampojn de sia krudmaterialo. Tiel Orienta Hindio estis devigita produkti kotonon, lanon, sisalon, juton, indigon ktp por Britio.[271] La konstanta „superfluig-ado” de laboristoj en la landoj de granda industrio instigas al forceje rapida elmigrado kaj koloniado de fremdaj landoj kiuj transformiĝas en liverantojn de krudmaterialo por la metropolo[272], kiel ekz-e Aŭstralio en liveranton de lano.[273] Kreiĝas nova, por la ĉefsidejoj de la maŝinsistemo taŭga internacia labordivido, kiu transformas parton de la terglobo en

270 Aliaj metodoj, per kiuj la maŝinsistemo efikas sur la produktado de krud-materialo, estas menciotaj en la Tria Libro.

271 Kotoneksporto de Orienta Hindio al Britio (en funtoj)

1846: 34.540.143; 1860: 204.141.168; 1865: 445.947.600

Laneksporto de Orienta Hindio al Britio (en funtoj)

1846: 4.570.581; 1860: 20.214.173; 1865: 20.679.111

272 *Originale: des Mutterlands* (de la patrinlando [de la industrio]). -vl

273 Laneksporto de la Kabo de Bonespero al Britio (en funtoj)

1846: 2.958.457; 1860: 16.574.345; 1865: 28.820.623

Laneksporto de Aŭstralio al Britio

1846: 21.789.346; 1860: 59.166.616; 1865: 109.734.261

precipe terkulturan produktadkampon por la alia kiel precipe industria produktadkampo. Tiu revolucio estas ligita kun la revolucioj en la kampkulturo, kiuj ĉi tie ankoraŭ ne detale trakteblas.[274]

Laŭ propono de s-ro Gladstone la Ĉambro de Deputitoj la 18-an de februaro 1867 ordonis statistikon pri ĉiuj de 1831 ĝis 1866 en la Unuiĝintaj Reĝlandon importitaj kaj el ĝi eksportitaj greno, maizo kaj ĉia faruno. Mi donas en la sekvo la resuman rezulton. La faruno estas reduktita al kvartoj de greno *[1 kvarto = 126.699 kilogramoj, laŭ la franca eldono]*

274 La ekonomia evoluo de Usono estas mem produkto de la eŭropa, pli precize angla granda industrio. En ĝia nuna stato ĝi ankoraŭ daŭre konsiderendas kolonia lando de Eŭropo.

*Aldono al la 4-a eldo.:* Ekde tiam ĝi evoluis al la dua industrilando de la mondo, sen pro tio esti tute perdinta sian kolonian karakteron. – *Frederiko Engelso*.

Kotoneksporto de Usono al Britio (en funtoj)

1846: 401.949.393; 1852: 765.630.544;

1859: 961.707.264; 1860: 1.115.890.608

Eksporto de greno ktp el Usono al Britio (1850 kaj 1862, en kvintaloj)

| **speco** | **1850** | **1862** |
|---|---|---|
| tritiko | 16.202.312 | 41.033.503 |
| hordeo | 3.669.653 | 6.624.800 |
| aveno | 3.174.801 | 4.426.994 |
| sekalo | 388.749 | 7.108 |
| tritikfaruno | 3.819.440 | 7.207.113 |
| fagopiro | 1.054 | 19.571 |
| maizo | 5.473.161 | 11.694.818 |
| bere aŭ bigg (aparta speco de hordeo) | 2.039 | 7.675 |
| pizoj | 811.620 | 1.024.722 |
| fazeoloj | 1.822.972 | 2.037.137 |
| *entute* | *35.365.801* | *74.083.441* |

**Kvinjaraj periodoj kaj la jaro 1866**

*Jara mezumo de la importoj:*

| | |
|---|---|
| 1831-1835 | 1.096.373 |
| 1836-1840 | 2.389.729 |
| 1841-1845 | 2.843.865 |
| 1846-1850 | 8.776.552 |
| 1851-1855 | 8.345.237 |
| 1856-1860 | 10.913.612 |
| 1861-1865 | 15.009.871 |
| 1866 | 16.457.340 |

*Jara mezumo de la eksportoj:*

| | |
|---|---|
| 1831-1835 | 225.263 |
| 1836-1840 | 251.770 |
| 1841-1845 | 139.056 |
| 1846-1850 | 155.461 |
| 1851-1855 | 307.491 |
| 1856-1860 | 341.150 |
| 1861-1865 | 302.754 |
| 1866 | 216.218 |

*Pluso de la importo super la eksporto de la mezumaj jaroj:*

| | |
|---|---|
| 1831-1835 | 871.110 |
| 1836-1840 | 2.137.959 |
| 1841-1845 | 2.704.809 |

| | |
|---|---|
| 1846-1850 | 8.621.091 |
| 1851-1855 | 8.037.746 |
| 1856-1860 | 10.572.462 |
| 1861-1865 | 14.707.117 |
| 1866 | 16,241,122 |

*Loĝantaro, jara mezuma nombro en ĉiu periodo:*

| | |
|---|---|
| 1831-1835 | 24.621.107 |
| 1836-1840 | 25.929.507 |
| 1841-1845 | 27.262.569 |
| 1846-1850 | 27.797.598 |
| 1851-1855 | 27.572.923 |
| 1856-1860 | 28.391.544 |
| 1861-1865 | 29.381.760 |
| 1866 | 29.935.404 |

*Mezuma kvanto da greno ktp en kvartoj jare konsumita po individuo, ĉe sama disdivido inter la loĝantaro, en pluso super la hejmlanda produkto:*

| | |
|---|---|
| 1831-1835 | 0,036 |
| 1836-1840 | 0,082 |
| 1841-1845 | 0,099 |
| 1846-1850 | 0,310 |
| 1851-1855 | 0,291 |
| 1856-1860 | 0,372 |
| 1861-1865 | 0,501 |
| 1866 | 0,543 |

La giganta kaj intermita ekspansio de la fabriksistemo kaj ĝia dependeco de la mondmerkato kreas nepre febrecan produktadon kaj sekve tropleniĝon de la merkatoj, per kies kuntiriĝo okazas paralizo. La vivo de la industrio transformiĝas al serio da periodoj de meza vigleco, prospero, superproduktado, krizo kaj stagnado. La malcerteco kaj malstabileco, al

kiu la maŝinsistemo submetas la laboron kaj per tio la vivsituacion de la laboristo, fariĝas normalaj kun tiu perioda ŝanĝiĝo de la industria ciklo. Escepte la tempojn de prospero, inter la kapitalistoj furoras plej akra batalo pri iliaj individuaj partoj de la merkata spaco. Tiu parto estas rekte proporcia al la malkareco de ilia produkto. Krom la konkurenco en la uzado de pli bonaj, laborforton anstataŭantaj maŝinoj kaj de novaj produktadmetodoj, ĉiufoje aperas punkto, kie oni strebas al malkarigo de la varo per premo de la salajro sub la valoron de la laborforto.[275]

Kresko de la nombro da fabriklaboristoj estas do kondiĉita al proporcie multe pli rapida kresko de la ĉioma kapitalo investita en la fabrikoj. Sed tiu procezo okazas nur ene de la flusaj kaj malflusaj periodoj de la industria ciklo. Ĝi estas krome ĉiam interrompata de la teĥnika progreso, kiu jen virtuale anstataŭas la laboriston, jen fakte elpuŝas lin. Tiu kvalita ŝanĝo en la maŝinsistemo konstante forigas laboristojn el la fabriko aŭ fermas ties pordegon al la alfluo de novaj rekrutoj, dum la nur kvanta etendiĝo de la fabrikoj apud la elĵetitaj voras freŝajn kontingentojn. La

275 En alvoko de la laboristoj senlaborigitaj per lokaŭto de la ŝufabrikistoj en Leicester al la anglaj *Trade Societies*, en julio 1866, legeblas i.a.: „De proksimume 20 jaroj la ŝufarado en *Leicester* estis revoluciigita per enkondukado de nitado anstataŭ kudrado. Oni tiam povis ricevi bonajn salajrojn. Baldaŭ tiu nova industrio tre entendiĝis. Montriĝis granda konkurenco inter la diversaj firmaoj pri kiu povas liveri la plej bonan artiklon. Mallonge poste tamen aperis pli malbona speco de konkurenco, nome tiu, en la merkato vendi pli malkare ol la aliaj. La malutilaj sekvoj montriĝis baldaŭ en malaltigo de salajro, kaj la falo de la laborprezo estis tiom rapida, ke multaj firmaoj pagas nun jam nur la duonon de la origina salajro. Kaj tamen, kvankam la salajroj sinkas pli kaj pli profunden, la profitoj ŝajnas kreski kun ĉia ŝanĝo de la labortarifo.” – Eĉ malfavoraj periodoj de la industrio estas uzataj de la fabrikistoj por fari eksterordinarajn profitojn per troigita malaltigo de salajro, t.e. per rekta ŝtelo de la plej necesaj vivrimedoj de la laboristo. Jen ekzemplo: Temas pri la krizo en la silkteksejoj en *Coventry*: „El informoj kiujn mi ricevis de fabrikistoj same kiel de laboristoj, ŝajnas rezulti senduba ke la salajroj estis reduktitaj en pli granda proporcio ol la konkurenco kun eksterlandaj produktistoj aŭ pro aliaj cirkonstancoj postulis. La plej multaj teksistoj laboras kun malaltigo de sia salajro je 30 ĝis 40 %. Peco da rubando, por kiu la teksisto kvin jarojn antaŭe ricevis 6 aŭ 7 ŝilingojn, donas al li nun nur 3 ŝilingojn 3 pencoj aŭ 3 ŝilingojn 6 pencoj; alia laboro, pagata antaŭe per 4 ŝilingoj kaj 4 ŝilingoj 3 pencoj, ricevas nun nur 2 ŝilingojn 3 pencoj. La redukto de salajro estas pli granda ol necesa por sproni la postulon. Efektive, ĉe multaj specoj de rubando la redukto de salajro estis eĉ ne akompanata de ia ajn malaltigo de la prezo de la artiklo.” (Raporto de la komisaro F. D. Longe en „*Child. Emp. Comm., V. Rep. 1866*”, p. 114, n.1)

laboristoj estas tiel konstante forpelataj kaj altirataj, ĵetataj alen kaj reen, kaj tio kun konstanta ŝanĝo koncerne sekson, aĝon kaj lertecon de la varbatoj.

La sortoj de la fabriklaboristo plej bone montriĝas per rapida rigardo super la sortoj de la angla kotonindustrio.

De 1770 ĝis 1815 la kotonindustrio estis depresia aŭ stagna dum 5 jaroj. Dum tiu unua 45-jara periodo la anglaj fabrikistoj posedis la monopolon de la maŝinsistemo kaj de la mondmerkato. De 1815 ĝis 1821 depresio; 1822 kaj 1823 prospero; 1824 nuligo de la leĝo kontraŭ sindikatoj, ĝenerala granda etendiĝo de la fabrikoj; 1825 krizo; 1826 granda mizero kaj ribeloj inter la kotonlaboristoj; 1827 iometa pliboniĝo, 1828 granda pliiĝo de vaporteksiloj kaj de eksporto; 1829 la eksporto, speciale al Hindio, superis ĉiujn antaŭajn jarojn; 1830 superplenaj merkatoj, granda ĉagreno, 1831 ĝis 1833 daŭra depresio; la komerco al orienta Azio (Hindio kaj Ĉinio) estas forprenita el la monopolo de la Orienthindia Kompanio. 1834 granda kresko de fabrikoj kaj de maŝinsistemo, manko de manoj. La nova leĝo pri malriĉuloj apogas la migradon de kamplaboristoj en la fabrikdistriktojn. La infanoj de la kamparaj distriktoj estas ensuĉitaj en la fabrikojn. Blanka sklavkomerco. 1835 granda prospero. Samtempa malsatmortigo de la permanaj kotonteksistoj, 1836 granda prospero. 1837 kaj 1838 depresio kaj krizo. 1839 revigliĝo. 1840 granda depresio, ribeloj, interveno de la armeo. 1841 kaj 1842 terura suferado de la fabriklaboristoj. 1842 la fabrikistoj lokaŭtas la manojn el la fabrikoj, por trudi la nuligon de la grenleĝoj. La laboristoj alfluas multmilope al Jorkŝiro, estas repelataj de la armeo, iliaj gvidantoj en Lankastro traktataj antaŭ tribunalo. 1843 granda mizero. 1844 revigliĝo. 1845 granda prospero. 1846 unue daŭra kresko, poste simptomoj de reago. Nuligo de la grenleĝoj. 1847 krizo. Ĝenerala malaltigo de la salajro je 10 elcentoj kaj pli por festi la *big loaf* (la panegon kiun la sinjoroj liberkomercistoj estis promesintaj dum sia agitado kontraŭ la grenleĝoj). 1848, persista depresio. Manĉestro sub armea protekto. 1849 revigliĝo. 1850 prospero. 1851 falantaj varprezoj, malaltaj salajroj, oftaj strikoj. 1852 ekpliboniĝo. Daŭrigo de la strikoj, la fabrikistoj minacas importi fremdajn laboristojn. 1853 kreskanta eksporto. Okmonata striko kaj granda mizero en *Preston*. 1854 prospero, tropleniĝo de la merkatoj. 1855 raportoj pri bankrotoj amase envenas el Usono, Kanado, orientaziaj merkatoj. 1856 granda prospero. 1857 krizo. 1858 pliboniĝo. 1859 granda prospero, pliiĝo de la fabrikoj. 1860 apogeo de la angla kotonindustrio. Hindaj, aŭstraliaj kaj aliaj merkatoj tiom troplenaj ke ili ankoraŭ 1863 estis apenaŭ sorbintaj la

tutan fatrason. Interkonsento pri komerco kun Francio. Kreskego de fabrikoj kaj de maŝinaro. 1861 la ekprospero daŭras por iom da tempo, reago, usona interna milito, kotonkrizo. De 1862 ĝis 1863 kompleta kolapso.

La historio de la kotonkrizo estas tro karakteriza por ne resti iomete ĉe ĝi. El la indikoj pri la situacioj de la mondmerkato de 1860 ĝis 1861 videblas, ke la kotonkrizo estis bona okazo por la fabrikoj kaj parte avantaĝa, fakto agnoskita en raportoj de la komerca ĉambro de Manĉestro, proklamita en la parlamento fare de Palmerston kaj Derby, konfirmita de la okazaĵoj.[276] Tamen inter la 2.887 kotonfabrikoj de la Unuiĝinta Reĝlando estis multaj malgrandaj. Laŭ la raporto de la fabrikinspektisto A. Redgrave, kies administra distrikto el tiuj 2.887 fabrikoj inkludis 2.109, el tiuj lastaj 392 aŭ 19 elcentoj uzis nur sub dek vaporĉevalpovojn.[277] La plej multaj malgrandaj fabrikoj estis teksejoj, starigitaj dum la prospera periodo ekde 1858, plej ofte de spekulistoj, el kiuj unu liveris la fadenon, la alia la maŝinaron, la tria la konstruaĵon, sub la direktorado de iamaj inspektistoj aŭ de aliaj senhavuloj. Tiuj etfabrikistoj plej ofte pereis. La saman sorton preparintus al ili la komerca krizo kiu ne eksplodis pro la kotonkrizo. Kvankam ili estis triono de la fabrikistoj, iliaj fabrikoj sorbis senkompare pli malgrandan parton de la kapitalo investita en la kotonindustrio. Koncerne la amplekson de la paralizo, laŭ aŭtentaj pritaksoj en oktobro 1862, 60,3 elcentoj de la ŝpiniloj kaj 58 elcentoj de la teksiloj estis haltigitaj. Tio koncernas la tutan industribranĉon kaj estis kompreneble tre diversa en la distriktoj. Nur tre malmultaj fabrikoj laboris plentempe (sesdek horojn semajne), la ceteraj kun interrompoj. Eĉ por la malmultaj laboristoj, kiuj laboris plentempe kaj kun la kutima popeca salajro, la semajna salajro nepre malgrandiĝis pro la anstataŭigo de bona kotono per pli malbona, de la *Sea Island* per egipta (en fajnŝpinejoj), de usona kaj egipta per orienthindia *surat* kaj de pura kotono per miksaĵoj de kotondefalaĵo kun surato. La pli mallonga fibro de la suratkotono, ĝia malpureco, la pli granda rompiĝemo de la fadenoj, la anstataŭigo de faruno per ĉiaj pli pezaj ingrediencoj ĉe glatigo de veftofadeno ktp malaltigis la rapidon de la maŝinoj kaj limigis kun la produktokvanto la popecan salajron. Ĉe uzado de surato kaj kun plentempa laboro la perdo de la laboristo estis dudek, tridek kaj pli da elcentoj. Sed la plej multaj fabrikistoj krome malaltigis la kvoton de la popeca salajro je kvin, sep kaj duono kaj dek elcentoj. Oni do komprenas la situacion de la laboristoj okupataj nur tri, tri kaj duono, kvar tagojn semajne aŭ nur ses horojn tage.

276 Kp „*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1862*”, p. 30.
277 l.c., p. 18, 19.

Post kiam okazis jam relativa pliboniĝo, en 1863, la semajnaj salajroj de teksistoj, ŝpinistoj ktp estis 3 ŝilingoj 4 pencoj, 3 ŝ. 10 d., 4 ŝ. 6 d., 5 ŝ. 1 d. ktp.[278] Eĉ en tiuj teruraj cirkonstancoj la inventemo de la fabrikisto ne laciĝis por salajromalaltigoj. Tiuj estis parte faritaj kiel puno por la mankoj de la faritaĵo ŝuldataj al ĝia malbona kotono, maltaŭgaj maŝinoj ktp. Sed kie la fabrikisto estis proprietulo de la kabanoj de la laboristoj, tiuj pagis mem siajn luprezojn per tio ke li dekalkulis ilin de la nominala salajro. La fabrikinspektisto Redgrave rakontas pri *self-acting minders* (laboristoj kiuj prizorgas paron da aŭtomataj *mules*), kiuj

> „fine de dusemajna laboro gajnis 8 ŝ. 11 d., kaj de tiu sumo la luprezo de la domo estis deprenita, el kiu la fabrikisto tamen redonis la duonon kiel donacon, tiel ke la *minders* kunportis hejmen plenajn 6 ŝ 11 d.. La semajna salajro de la teksistoj variis de 2 ŝ. 6 d. pli alten dum la fina tempo de 1862."[279]

Eĉ tiam la luprezo estis ofte deprenita el la salajroj, kiam la manoj laboris nur mallongan tempon.[280] Ne mirige, ke en kelkaj partoj de Lankaŝiro ia malsatpesto furiozis! Sed pli karakteriza ol ĉio ĉi estis, kiel la revoluciigo de la produktadprocezo okazis surkoste de la laboristo. Estis veraj *experimenta in corpore vili* [eksperimentoj ĉe senvalora korpo], kiel tiuj de la anatomiistoj ĉe ranoj.

> „Kvankam mi vidis, diras la fabrikinspektisto Redgrave, la realajn enspezojn de la laboristoj en multaj fabrikoj, oni devas ne konkludi ke ili ricevas la saman sumon ĉiusemajne. La laboristoj estas submetitaj al la plej grandaj fluktuoj pro la konstanta eksperimentado de la fabrikistoj … iliaj enspezoj kreskas kaj falas kun la kvalito de la kotonmiksaĵo; jen ili proksimiĝas je 15 elcentoj al siaj antaŭaj elspezoj, kaj en la sekva semajno aŭ en la due sekva ili falas je 50 ĝis 60 elcentoj."[281]

Tiuj eksperimentoj fariĝis ne nur surkoste de la vivrimedoj de la laboristoj. Tiuj pagis ilin per ĉiuj siaj kvin sensoj.

> „Tiuj laborantaj pri malfermado de surat-kotono informis min, ke la neeltenebla fetoro naŭzas kaj malsanigas ilin … Tiujn kiuj laboris en la laborejoj de miksado, de *scribbling* kaj de kardado la liberigitaj polvo kaj malpuraĵo iritas la aervojojn, kaŭzas tusadon kaj malfacilon spiri … Pro la mallongeco de la fibro oni aldonas al la fadeno dum glatigado grandan kvanton da substanco, nome diversajn substituaĵojn anstataŭ la antaŭe uzata faruno. Pro tio aperas naŭziĝo kaj digestproblemoj de la teksistoj. La polvo kaŭzas multajn kazojn de bronkito, same inflamon de la gorĝo, krome haŭtmalsanon pro la malpuraĵo

278 *„Reports of Fact. for 31st Oct. 1863"*, p. 41-45, 51.

279 Saml., p. 41, 42.

280 Saml., p. 57.

281 Saml., p. 50, 51.

kiun entenas la surato kaj kiu iritas la haŭton."

Aliflanke la substituaĵoj de la faruno estis vera fonto de profito por la sinjoroj fabrikistoj per pliigo de la fadenpezo. Ili igis „dek kvin funtojn da krudmaterialo, post teksado, pezi dudek funtojn".[282] En la raporto de la fabrikinspektistoj de la 30-a de aprilo 1864 oni legas:

> „La industrio uzas tiun helpfonton nun en vere maldeca mezuro. Mi scias el bona fonto, ke okfunta teksaĵo estas farata el $5^1/_4$ funtoj da kotono kaj $2^3/_4$ funtoj da apreturo; kaj alia teksaĵo de $5^1/_4$ funtoj entenis du funtojn da apreturo. Tiuj estis ordinaraj ĉemizŝtofoj por eksporto. En aliaj specoj oni kelkfoje aldonis 50 elcentojn da apreturo, tiel ke fabrikistoj povas fanfaroni, kaj ankaŭ vere fanfaronas, ke ili riĉiĝas per vendado de teksaĵoj por malpli da mono ol la fadeno kostas, kiu estas nominale en ĝi entenata."[283]

Sed la laboristoj suferis ne nur sub la eksperimentoj de la fabrikistoj en la fabrikoj kaj de la municipoj ekster la fabrikoj, ne nur pro malaltigo de salajro kaj senlaboreco, pro malabundo kaj almozo, pro la gloradoj de la membroj de ambaŭ ĉambroj de la parlamento.

> „Malfeliĉaj virinoj, senlaboraj pro la manko de kotono, fariĝis feĉo de la socio kaj restis tiaj … La nombro da junaj prostituitinoj kreskis pli ol de la lastaj 25 jaroj."[284]

Oni trovas do en la unuaj 45 jaroj de la brita kotonindustrio, de 1770 ĝis 1815, nur kvin jarojn da krizo kaj stagnado, sed tiu estis la periodo de ĝia mondmonopolo. La dua, 48-jara periodo de 1815 ĝis 1863, nombras nur dudek jarojn da reviglîĝo kaj prospero kaj 28 jarojn da depresio kaj stagnado. De 1815 ĝis 1830 komenciĝas la konkurenco kun la kontinenta Eŭropo kaj Usono. Ekde 1833 la etendado de la aziaj merkatoj estas trudata per „detruado de la homraso". Ekde la nuligo de la grenleĝoj, de 1846 ĝis 1863, aperas ok jaroj da meza vigleco kaj prospero kaj naŭ jaroj da depresio kaj stagnado. La situacio de la plenkreskaj viraj kotonlaboristoj, eĉ dum la prospera tempo, takseblas el la aldonita noto.

282 Saml., p. 62, 63.
283 „*Reports etc. 30th April 1864*", p. 27.
284 El letero de la polica ĉefo Harris von Bolton en „*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*", p. 61, 62.

## 8. Revoluciigo de manufakturo, metio kaj domlaboro per la granda industrio

### *a) Detruado de la kunlaborado bazita sur metio kaj labordivido*

Ni vidis, kiel la maŝinsistemo forigas la kunlaboradon bazitan sur la metio kaj la manufakturon bazitan sur divido de la metia laboro. Ekzemplo de la unua speco estas la kudromaŝino, ĝi anstataŭas la kunlaboradon de kudristoj. Okulfrapa ekzemplo de la dua speco estas la maŝino por fabrikado de kudropingloj. Laŭ Adam Smith liatempe dek viroj produktis per labordivido ĉiutage pli ol 48.000 kudropinglojn. Sed unu sola maŝino liveras 145.000 en unu dekunuhora labortago. Virino aŭ knabino prizorgas mezume kvar da tiaj maŝinoj kaj do produktas per la maŝinoj ĉiutage 600.000, en la semajno pli ol tri milionojn da kudropingloj.[285] Se unu sola labormaŝino anstataŭas la kunlaboradon aŭ la manufakturon, tiam ĝi povas siavice fariĝi la bazo de metia reĝimo. Tamen tiu reproduktiĝo de metia entrepreno, kiu baziĝas sur maŝinoj, estas nur transiro al fabrikreĝimo, kiu ĝenerale aperas ĉiam, ekde kiam meĥanika movforto, vaporo aŭ akvo, anstataŭas la homajn muskolojn por movi la maŝinon. Sporade kaj ankaŭ nur provizore malgranda entrepreno povas ligiĝi kun meĥanika movforto per luado de vaporo, kiel oni faras en kelkaj manufakturoj de Birminghamo, per uzado de malgrandaj varmaeraj maŝinoj, kiel en kelkaj branĉoj de teksado ktp.[286] En la silkteksa industrio en *Coventry* evoluis sponte la eksperimento de la „kabanfabrikoj". En la mezo de kabanvicoj, konstruitaj laŭ kvadrata plano, oni starigis tiel nomatan maŝindomon por la vapormaŝino, kaj tiu estis per ŝaftoj konektita kun la teksiloj en la kabanoj. En ĉiuj kazoj la vaporo estis luita, ekz-e po du ŝilingoj kaj duono por ĉiu teksilo. Tiu vaporrento estis pagenda semajne, egale ĉu la teksiloj laboris aŭ ne. Ĉiu kabano ricevis du ĝis ses teksilojn, kiuj apartenis al la laboristoj, ĉu aĉetitaj per kredito, ĉu luitaj. La batalo inter la kabanfabriko kaj la propradira fabriko daŭris pli ol dek du jarojn. Ĝi finiĝis per la kompleta ruiniĝo de la tricent kabanfabrikoj.[287] Kie la naturo de la procezo ne postulis dekomence grandskalan produktadon, la en la lastaj jardekoj nove aperintaj industrioj, ekz-e farado de leterkuvertoj, de ŝtalplumoj ktp, trairis ĝenerale unue la metian reĝimon kaj poste la manufakturan reĝimon kiel mallongvivajn transirajn fazojn al la

---

285 „*Child. Empl. Comm., III. Report*", 1864, p. 108, n. 447.

286 En Usono oftas tia reproduktiĝo de metio surbaze de maŝinoj. La koncentriĝo, ĉe la neevitebla transiro al la fabriksistemo, ĝuste pro tio, kompare kun Eŭropo kaj eĉ kun Anglio, okazos tie per gigantaj paŝoj.

287 Kp „*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*", p. 64.

fabrikreĝimo. Tiu metamorfozo restas tie plej malfacila, kie la manufaktura produktado ne inkludas ŝtupan sinsekvon de evoluprocezoj, sed multecon da disaj procezoj. Tio konsistigis ekz-e grandan malhelpon al la ŝtalplumfabriko. Sed jam antaŭ proksimume jardeko kaj duono oni inventis aŭtomaton kiu plenumas ses disajn procezojn samtempe. La metio liveris la unuajn dek du dekduojn da ŝtalplumoj en la jaro 1820 por sep sterlingaj pundoj kaj kvar ŝilingoj, la manufakturo liveris ilin en 1830 je ok ŝilingoj, kaj la fabriko liveras ilin hodiaŭ al la pogranda komerco je du ĝis dek pencoj.[288]

## b) Reefiko de la fabriksistemo al manufakturo kaj domlaboro

Kun la evoluo de la fabriksistemo kaj de la ĝin akompananta revolucio de la kampkulturo ne nur etendiĝas la skalo de produktado en ĉiuj aliaj industribranĉoj, sed krome ilia karaktero ŝanĝiĝas. La principo de la maŝinsistemo, nome analizi la produktadprocezon en ĝiaj konsistigaj fazoj kaj solvi la tiel estiĝantajn problemojn per aplikado de la meĥaniko, ĥemio ktp, do de la natursciencoj, fariĝas ĉie determinanta. La maŝino entrudiĝas do jen por tiu, jen por alia partprocezo en la manufakturojn. La fiksa kristaliĝo de ĝia strukturo, devena el la malnova labordivido, per tio dissolviĝas kaj lasas la lokon al konstanta ŝanĝado. Sendepende de tio, la konsisto de la ĉiomlaboristo aŭ de la kombinita laborpersonaro estas ĝisfunde revoluciata. Kontraste al la manufakturperiodo la plano de labordivido baziĝas nun sur uzado de virina laboro, de laboro de ĉiaaĝaj infanoj, de nelertaj laboristoj, kie ajn tio eblas, mallonge de la malmultekosta laboro, *„cheap labour”*, kiel la angloj karakterize nomas ĝin. Tio veras ne nur pri ĉia grandskala kombinita produktado, egale ĉu ĝi aplikas aŭ ne maŝinojn, sed ankaŭ por la tiel nomata hejmindustrio, praktikata en la privataj loĝejoj de la laboristoj aŭ en etaj laborejoj. Tiu tiel nomata hejmindustrio havas kun la eksmoda industrio – kiu kondiĉas sendependan urban metion, sendependan terkulturadon kaj ĉefe domon de la laborista familio – nenion komunan ol la nomon. Ĝi estas nun transformita en

288 S-ro Gillott konstruis en Birminghamo la unuan grandskalan ŝtalplum-manufakturon. Ĝi liveris jam en 1851 pli ol 180 milionojn da plumoj kaj konsumis jare 120 tunojn da ŝtallado. Birminghamo, kiu monopoligas tiun industrion en la Unuiĝinta Reĝlando, produktas nun jare miliardojn da ŝtalplumoj. La nombro da dungitoj estis laŭ la nombrado de 1861: 1.428, el kiuj 1.268 laboristinoj, dungitaj ekde la 5-a vivojaro.

la eksteran departementon de la fabriko, de la manufakturo aŭ de la vendejo. Apud la fabriklaboristoj, manufakturlaboristoj kaj metiistoj, kiujn ĝi en grandaj amasoj koncentras kaj rekte komandas, la kapitalo movas per nevideblaj fadenoj ceterajn armeojn da hejmlaboristoj en la grandaj urboj kaj dissemitaj tra la plata lando. Ekzemplo: la ĉemizfabriko de la sinjoroj Tillie en *Londonderry*, Irlando, kiu laborigas mil fabrik-laboristojn kaj naŭ mil hejmlaboristojn disajn en la kamparo.[289]

La ekspluatado de malmultekostaj kaj infanaj laborfortoj fariĝas en la moderna manufakturo pli senhonta ol en la propradira fabriko, ĉar tie la ekzistanta teĥnika bazo, anstataŭigo de muskolforto per maŝinoj kaj facileco de la laboro, tie grandparte ne ekzistas, kaj samtempe la ina aŭ ankoraŭ nematura korpo estas plej senskrupule elmetita al la influoj de venenaj substancoj ktp. Ĝi fariĝas en la t.n. hejmlaboro pli skandala ol en la manufakturo, ĉar la rezistkapablo de la laboristoj malpliiĝas kun ilia diseco, tuta vico da rabaj parazitoj ŝoviĝas inter la vera mastro[290] kaj la laboristo, ĉar la hejmlaboro batalas ĉie kontraŭ la maŝin- aŭ almenaŭ la manufaktur-sistemo en la sama produktadbranĉo, ĉar la malriĉeco malebligas al la laboristo akiri la necesajn laborkondiĉojn, spacon, lumon, ventumadon ktp, ĉar la dungeco fariĝas pli kaj pli malregula, kaj fine ĉar en tiuj lastaj rifuĝejoj de tiuj, kiujn la grandaj industrio kaj kampkulturo „superfluigis”, la konkurenco inter laboristoj nepre atingas sian maksi-mumon. La ne frue ol per la maŝinsistemo sisteme elformita ŝparado de produktadrimedoj, kiuj estis dekomence jam samtempe plej senskrupula malŝparo de laborforto kaj rabado de la normalaj kondiĉoj de la labor-funkcio, elmontras nun tiun sian antagonisman kaj hommurdan flankon des pli, ju malpli en industribranĉo la socia produktivo de la laboro kaj la teĥnika bazo de kombinitaj laborprocezoj estas evoluintaj.

## c) La moderna manufakturo

Mi nun klarigu la suprajn asertojn per kelkaj ekzemploj. La leganto konas efektive jam amasajn atestojn el la sekcio pri la labortago. La metalmanufakturoj en Briminghamo kaj ĉirkaŭaĵo uzas grandparte por tre peza laboro 30.000 infanojn kaj junulojn apud 10.000 virinoj. Oni trovas

289 „*Child. Empl. Comm., II. Rep.*”, 1864, p. LXVIII, n. 415.

290 Ĉie tie Markso uzas la germanan terminon *Arbeitgeber* („labordonisto”, termino kontraŭ kiu Engelso aliloke polemikas) anstataŭ mastro, dungisto, fabrikisto, entreprenisto. Vd Frederiko Engelso: Pri la tria eldono [de *La kapitalo*], en tiu ĉi libro, p. 29. -vl

ilin tie en la sanmalfavoraj kuprofandejoj, butonfabrikoj, lazurejoj, emajl-ejoj kaj lakejoj.[291] La laborekscesoj por plenkreskuloj kaj neplenkreskuloj certigis al diversaj londonaj gazet- kaj libro-presejoj la faman nomon „La buĉejo”.[292] La samaj ekscesoj, kies viktimoj estis ĉi tie ĉefe virinoj, knabinoj kaj infanoj, okazis en la librobindejoj. Peza laboro por neplenkreskuloj en ŝnuregfarejoj, noktlaboro en salminejoj, kandelaj kaj aliaj ĥemiaj manufakturoj; knaboj estas kruele foruzataj en la silkteksejoj en ne meĥanika reĝimo, por turni la teksilojn.[293] Unu el la plej fiaj, malpuraj kaj plej malbone pagataj laboroj, por kiu oni preferas uzi junajn virojn kaj virinojn, estas la kribrado de ĉifonoj. Oni scias, ke Britio, sendepende de sia propra amasego da ĉifonoj, estas la stokejo por la tutmonda ĉifonkomerco. Ili alfluas tien el Japanio, el la plej malproksimaj ŝtatoj de Sudameriko kaj de la Kanariaj Insuloj. Sed ĝiaj ĉefaj provizfontoj estas Germanio, Francio, Ruslando, Italio, Egiptio, Turkio, Belgio kaj Nederlando. Ili servas por sterkado, fabrikado de flokoj (por litaĵoj), *shoddy* (artefarita lano) kaj kiel krudmaterialo por papero. La inaj ĉifonkribristoj estas la medio kiu disvastigas variolon kaj aliajn kontaĝajn malsanojn, kies unuaj viktimoj ili estas.[294] Klasika ekzemplo de trolaboro, peza kaj maltaŭga laboro kaj pro tio sekva brutaligo de la laboristoj konsumataj jam de sia infaneco, estas krom la produktado en minejoj kaj karbejoj, la brik- aŭ tegol-farado, por kiu oni en Anglio jam nur sporade uzas la nove inventitan maŝinon (1866). Inter majo kaj septembro la laboro daŭras de la kvina matene ĝis la oka vespere, kaj, kie la sekigado okazas en libera aero, ofte de la kvara matene ĝis la naŭa vespere. La labortago de la kvina matene ĝis la oka vespere estas konsiderata „reduktita”, kiel „modera”. Geinfanoj estas uzataj ekde sia sesa vivjaro kaj eĉ ekde la kvara. Ili laboras dum la sama horaro, ofte pli longe ol la plenkreskuloj. La laboro estas peniga, kaj la somera varmego ankoraŭ pli akrigas la elĉerpitecon. Ekzemple en brikejo de *Mosley* 24-jara knabino faris du mil brikojn tage, subtenate de du neplenkreskaj knabinoj kiel helpantoj, kiuj portis la argilon kaj amasigis la brikojn. Tiuj knabinoj portis ĉiutage dek tunojn supren tra la glitigaj flankoj de la fosejo tridek futojn profunda tra distanco de ducent dek futoj.

---

291 Kaj nun eĉ infanojn ĉe fajloŝlifado en Ŝefildo!

292 „*Child. Empl. Comm., V. Rep.*”, 1866, p. 3, n. 24; p. 6, n. 55; p. 7, n. 59, 60.

293 Saml., p. 114, 115, n. 6-7. La komisaro rimarkigas prave, ke, dum alie la maŝino anstataŭas la homon, ĉi tie la knabo laŭvorte anstataŭas la maŝinon.

294 Vd la raporton pri la ĉifonkomerco kaj multnombrajn atestojn: „*Public Health, VIII. Report*”, Londono, 1866, Appendix, p. 196-208.

„Por infano ne eblas pasi tra la purgatorio de brikfarejo sen granda morala degradiĝo … La fia lingvaĵo kiun ili aŭdas de sia plej juna aĝo, la krudaj, obscenaj kaj senhontaj kutimoj, sub kiuj ili senscie kaj duonsovaĝe elkreskas, faras ilin por la posta vivtempo senleĝaj, forlasitaj, diboĉemaj. Terura fonto de demoraliĝo estas la la loĝmaniero. Ĉiu *moulder* (formisto), kiu estas ĉiam lerta laboristo kaj ĉefo de grupo, donas al siaj sep subordigitoj manĝon kaj loĝadon en sia kabano. Ĉu membroj aŭ ne de lia familio, viroj, knaboj, knabinoj dormas en la kabano. Tiu konsistas kutime el du, nur esceptokaze el tri ĉambroj, ĉiuj teretaĝaj, kun malmulta ventumado. La korpoj estas tiom elĉerpitaj pro la granda ŝvitado dum la tago, ke oni neniel observas iajn ajn sanregulojn, purecon nek decon. Multaj tiaj kabanoj estas veraj modeloj de malordo, malpureco, koto kaj polvo … La plej granda malbono de tiu sistemo kiu uzas junajn knabinojn por tia laboro konsistas en tio ke ĝi ekde ilia infanaĝo katenas ilin por ilia tuta posta vivo al la plej fia feĉo. Ili fariĝas krudaj, fiparolaj buboj (*rough, foulmouthed boys*), antaŭ ol la naturo instruis al ili esti inaj. Vestitaj en malmultaj malpuraj ĉifonoj, kun la gamboj ĝis multe super la genuoj nudaj, hararo kaj vizaĝo makulitaj per koto, ili lernas trakti ĉiajn sentojn de deco kaj pudoro kun malestimo. Dum la manĝotempo ili kuŝas sternitaj sur la kampoj aŭ rigardas la knabojn kiuj banas sin en najbara kanalo. Kiam ilia peza taglaboro estas fine finita, ili vestas pli bonajn vestaĵojn kaj akompanas la virojn en drinkejojn."

Ke la plej granda ebrieco regas en tiu tuta klaso ekde la infaneco, tio estas nur natura.

„La plej granda malbono estas ke la brikfaristoj dubas pri si mem. Vi povus, diris iu el la pli bonaj al la subpastro de *Southallfield*, same bone provi levi kaj plibonigi la diablon ol brikiston, sinjoro!"[295]

Pri la kapitalisma raciigo[296] de la laborkondiĉoj en la moderna manufakturo (sub kiu ĉi tie kompreniĝu ĉiuj grandskalaj laborejoj, kun la escepto de veraj fabrikoj) oni trovas oficialan kaj plej abundan materialon en la IV-a (1861) kaj la VI-a (1864) „*Public Health Report* [Raporto pri publika sano]". La priskribo de la laborejoj (*workshops*), speciale de la londonaj presistoj kaj tajloroj, superas la plej naŭzajn fantaziojn de niaj romanverkistoj. La efiko sur la sanstato de la laboristoj estas memkomprenebla. D-ro Simon, la plej alta kuracista oficisto de la *Privy Council* kaj oficiala eldonisto de la „*Public Health Reports*", diras interalie:

„En mia kvara raporto" (1861) „mi montris, ke por la laboristoj praktike maleblas insisti pri tio kio estas ilia unua sanrajto, la rajto ke, por kia ajn celo

295 „*Child. Empl. Comm., V. Report*", 1866, p. XVI-XVIII, n. 86-97 kaj p. 130 ĝis 133, n. 39-71. Kp ankaŭ saml. *III Report*, 1864, p. 48., 56.

296 En la originalo: „*Ökonomisierung*", nocio kies nuntempa termino estas raciigo. -vl

ĝia uzanto ĝin kunigas, la laboro, tiom kiom dependas de li, devas esti libera de ĉiaj eviteblaj cirkonstancoj malfavoraj al la sano. Mi pruvis ke, dum la laboristoj estas praktike nekapablaj mem akiri tiun sanjustecon, ili ne povas ricevi efikan helpon de la homoj taskitaj oficiale administri la sanpolicon … La vivo de miriadoj da gelaboristoj estas nun senutile torturata kaj mallongigata per la senfina korpa suferado, kiun kaŭzas nur ilia laboro."[297]

Por ilustri la influon de la laborejoj sur la sanstaton, d-ro Simon donas la jenan liston de mortoj:[298]

| Nombro da personoj de ĉiuj aĝoj en la resp. ind. | Industrioj komparataj koncerne sanon | Mortokvoto je 100.000 viroj en la resp. aĝoj **25-35** jaroj | **35-45** jaroj | **45-55** jaroj |
|---|---|---|---|---|
| 958.265 | Kampkult. en en Anglio kaj Kimrio | 743 | 805 | 1.145 |
| 22.301 viroj<br>12.377 virinoj | londonaj tajloroj | 958 | 1.262 | 2.093 |
| 13.803 | londonaj presistoj | 894 | 1.747 | 2.367 |

## ĉ) La moderna hejmlaboro

Ni rigardu nun la tiel nomatan hejmlaboron. Por fari al si bildon pri tiu sfero de ekspluatado de la kapitalo, konstruita en la fono de la granda industrio, kaj pri ĝiaj monstraĵoj, oni rigardu ekz-e la ŝajne tute idilian najloproduktadon praktikatan en kelkaj foraj vilaĝoj de Anglio.[299] Ĉie tie

297 „*Public Health, VI. Rep.*", Londono, 1864, p. 29, 31.

298 l.c., p. 30. D-ro Simon rimarkigas, ke la mortokvoto de la londonaj tajloroj kaj presistoj de la 25-a ĝis la 35-a jaro estas efektive multe pli granda, ĉar iliaj londonaj dungistoj ricevis grandan nombron da junuloj ekde 30-jaraj kaj pli el la kamparo kiel „metilernantoj" kaj „*improvers*" (kiuj volas formiĝi en tiu metio). Tiuj aperas en la nombrado kiel londonanoj, ili pufigas la nombron laŭ kiu kalkuliĝas la londona mortokvoto sen proporcie kontribui al la nombro de la londonaj mortokazoj; ĉar granda parto da ili revenas al la kamparo, kaj aparte ĉe gravaj malsanoj. (l.c.)

299 Temas ĉi tie pri martelitaj najloj kaj ne pri tiuj maŝin-tranĉitaj najloj. Vd

suficas kelkaj ekzemploj el la branĉoj de puntfabrikado kaj de pajloplekt-ado kiuj ankoraŭ ne laboras per maŝinoj aŭ kiuj konkurencas kun maŝin-aŭ manufaktur-sistemo.

El la 150.000 personoj dungitaj en la angla puntproduktado, proksimume 10.000 estas submetitaj al la fabrikleĝo de 1861. La grandega plimulto de la restantaj 140.000 estas virinoj, junuloj kaj geinfanoj, kvankam la vira sekso estas nur malforte reprezentata. La sanstato de tiuj „malmultekosta” ekspluatmaterialo rezultas el sekva listo de d-ro Trueman, kuracisto ĉe la *General Dispensary* de Notinghamo. El po 686 pacientoj, puntfaristinoj, plej ofte inter 17- kaj 24-jaraj, estis ftizaj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1852 | 1 el 45, | 1857 | 1 el 13, |
| 1853 | 1 el 28, | 1858 | 1 el 15, |
| 1854 | 1 el 17, | 1859 | 1 el 9, |
| 1855 | 1 el 18, | 1860 | 1 el 8, |
| 1856 | 1 el 15, | 1861 | 1 el 8.[300] |

Tiu progreso de la ftizo-kvoto devas sufiĉi al la plej optimista progresemulo kaj al la plej mensogema germana propagandisto de liberkomerco.

La fabrikleĝo de 1861 reguligas la fabrikadon de puntoj per maŝinoj, kaj tio estas la regulo en Anglio. La branĉoj, kiujn ni ĉi tie mallonge konsideras – ne, en kiuj la laboristoj estas koncentritaj en manufakturoj, vendejoj ktp, sed nur kie ili estas la tiel nomataj hejmlaboristoj –, dividiĝas en

1. la *lace finishing* (lasta finpretigo de la maŝine faritaj puntoj, kategorio kiu siavice inkludas multnombrajn subdividojn),

2. trikado de puntoj.

La *lace finishing* estas farata en hejmlaboro, aŭ en tiel nomataj *mistress houses* aŭ de virinoj, unuope aŭ kun iliaj infanoj, en iliaj privataj loĝejoj. La virinoj, kiuj tenas tiajn *mistress houses*, estas mem malriĉaj. La laborejo estas parto de ilia privata loĝejo. Ili ricevas mendojn de fabrikistoj, posedantoj de magazenoj ktp kaj laborigas virinojn, knabinojn kaj junajn infanojn, laŭ la grandeco de iliaj ĉambroj kaj laŭ la fluktuanta postulo de la komerco. La nombro da okupataj laboristinoj ŝanĝiĝas de dudek ĝis kvardek en kelkaj laborejoj, de dek ĝis dudek en aliaj. La mezuma minimuma aĝo, en kiu infanoj komencas, estas ses jaroj, sed ĉe

„*Child. Empl. Comm., III. Report*”, p. XI, p. XIX n. 125-130; p. 52 n. 11; p. 113-114 n. 487; p. 137 n. 674.

300 „*Child. Empl. Comm., II. Report*”, p. XXII, n. 166.

kelkaj sub kvin jaroj. La kutima labortempo daŭras de la oka matene ĝis la oka vespere, kun unu horo kaj duono por manĝoj, okazigataj malregule kaj ofte en la fetoraj labortruoj mem. Kiam la aferoj iras bone, la laboro daŭras ofte de la oka (kelkfoje de la sesa) matene ĝis la deka, dekunua aŭ dekdua nokte. En anglaj kazernoj la preskribita spaco por ĉiu soldato estas de 500 ĝis 600 kubikfutoj, en la militaj malsanulejoj 1.200. En tiuj labortruoj ĉiu persono havas de 67 ĝis 100 kubikfutoj. Samtempe gaslumo konsumas la oksigenon de la aero. Por teni la punton pura, la infanoj devas ofte demeti la ŝuojn, ankaŭ dumvintre, kvankam la planko konsistas el pavimo aŭ brikoj.

> „Ne estas io nekutima en Notinghamo trovi 15 ĝis 20 infanojn kunpremitaj en ĉambreto de eble ne pli ol 12 kvadratfutoj, okupataj dum 15 horoj el 24 de laboro kiu estas per si mem elĉerpiga pro ega tedigo kaj monotoneco, farata krome en ĉiaj eblaj sandetruaj cirkonstancoj. … Eĉ la plej junaj infanoj laboras per streĉa atento kaj rapido, kiuj estas mirigaj, lasante al siaj fingroj preskaŭ neniam trankvilon aŭ malpli rapidan moviĝon. Se oni faras demandon al ili, ili ne levas la okulon de la laboro, pro timo perdi momenton.”

La „longa bastono” servas al la *mistress* kiel incitilo en la proporcio laŭ kiu la labortempo estas longigata.

> „La infanoj iom post iom laciĝas kaj ekscitiĝas antaŭ la fino de sia longa submetiĝo al okupiĝo monotona, la okulojn agresanta, elĉerpiga per la monotoneco de la korpa teniĝo. Tio estas kvazaŭ sklavlaboro (*Their work is like slavery*).”[301]

Kie virinoj laboras kun siaj propraj infanoj hejme, do en la moderna senco, en luita ĉambro, tre ofte en subtegmentejo, la kondiĉoj estas eble ankoraŭ pli malbonaj. Tiu laboro estas distribuata en rondo de okdek mejloj en la ĉirkaŭaĵo de Notinghamo. Se la infano okupata en magazeno forlasas ĝin je la naŭa aŭ deka vespere, oni ofte donas al ĝi ankoraŭ pakaĵon por ke ĝi finpretigu ĝin hejme. *„Tio estas por panjo”*, diras per tiu preskaŭ sankta frazo la dungita lakeo kiu reprezentas la kapitalistan hipokritulon, tamen bone sciante ke la kompatinda infano devas maldormi kaj helpi.[302]

La industrio de punttrikado praktikiĝas precipe en du anglaj kampkulturaj distriktoj, la *Honiton*-puntdistrikto, dudek ĝis tridek mejlojn laŭlonge de la suda marbordo de Devonŝiro, kun inkludo de malmultaj lokoj de Norda Devono, kaj alia distrikto kiu entenas grandan parton de la

301„*Child. Empl. Comm., II. Report*”, p. XIX, XX, XXI.

302l.c., XXI, XXII.

distriktoj de Bukinghamo, Bedfordo, Northampton kaj la najbarajn partojn de Oksfordŝiro kaj Hundingdonŝiro. La laboro okazas ĝenerale en la kabanoj de la kampkulturaj taglaboristoj. Kelkaj manufaktur-mastroj laborigas tiel pli ol tri mil tiajn hejmlaboristojn, precipe infanojn kaj junulojn, ekskluzive inajn. La kondiĉoj priskribitaj ĉe la *lace finishing* ripetiĝas ĉi tie, kun la sola diferenco ke anstataŭ la *mistress houses* ni havas ĉi tie la tiel nomatajn *lace schools* (puntlernejojn), tenatajn de malriĉulinoj en siaj kabanoj. Ekde la 5-a vivojaro, kelkfoje pli junaj, ĝis la 12-a aŭ 15-a jaro la infanoj laboras en tiuj lernejoj, dum la unuaj jaroj la plej junaj de kvar ĝis ok horoj, poste de la sesa matene ĝis la oka kaj deka vespere.

> „La ĉambroj estas ĝenerale ordinaraj loĝĉambroj de malgrandaj kabanoj, kun la kameno ŝtopita por malebligi trablovon, la homoj ene, kelkfoje eĉ dum-vintre, hejtataj nur per sia propra animala korpovarmo. En aliaj kazoj tiuj tiel nomataj lernejaj ĉambroj similas etajn provizejojn, sen forno. La tropleneco de tiuj truoj fetorigas la aeron, ofte ekstreme. Aldoniĝas la malutila efiko de defluiloj, necesejoj, putrantaj materialoj kaj aliaj aĉaĵoj kiuj troviĝas kutime ĉe la aliroj al malgrandaj kabanoj."

Koncerne la spacon:

> „En puntlernejo [mi vidis, diras inspektisto] dek ok knabinojn kaj la majstrinon, kun 33 kubikfutoj por ĉiu persono; en alia, en neeltenebla fetoro, dek ok personojn, po $24^1/_4$ kubikfutoj. En tiu industrio oni trovas laborantaj dujarajn infanojn kaj dujarajn kaj duono."[303]

Kie la punttrikado en la kamparaj distriktoj de Bukinghamo kaj Bedfordo ĉesas, tie komenciĝas la pajloplektado. Tiu etendiĝas tra granda parto de Hertfordŝiro kaj la okcidentaj kaj nordaj partoj de Esekso. En la jaro 1861 en plajloplektado kaj farado de pajloĉapeloj estis okupataj 48.043 personoj, el kiuj 3.815 estis viraj de ĉiuj aĝoj, la ceteraj inaj, nome 14.913 malpli aĝaj ol dudekjaraj, el kiuj proksimume sep mil infanoj. Sur la lokon de la puntlernejoj venas ĉi tie la *straw plait schools* (pajloplektolernejoj). La infanoj komencas ĉi tie la instruadon de pajloplektado kutime de la kvara, kelkfoje inter la tria kaj la kvara vivojaro. Kompreneble ili ne ricevas edukadon. La infanoj mem nomas la bazlernejojn *natural schools* (naturaj lernejoj) kontraste al tiuj sangosuĉaj institucioj, en kiuj oni simple tenas ilin ĉe la laboro, por plenumi la taskon preskribitan al ili de siaj patrinoj, plej ofte tridek jardojn tage. Tiuj patrinoj laborigas ilin poste ankoraŭ hejme ĝis la deka, dekunua, dekdua nokte. La pajlo tranĉas al ili la fingrojn kaj la buŝon, per kiu ili konstante malsekig-

303 Saml., p. XXIX, XXX.

as ĝin. Laŭ la opinio de la kuracistaj oficistoj de Londono, resumita de d-ro Ballard, 300 kubikfutoj estas la minimuma spaco por ĉiu persono en dorm- aŭ labor-ĉambro. Sed en la pajloplektaj lernejoj la spaco estas ankoraŭ malpli granda ol en la puntlernejoj, $12^2/_3$, 17, $18^1/_2$ kaj sub 22 kubikfutoj por ĉiu persono.

> „La pli malgranda el tiuj nombroj”, diras la komisaro White, „reprezentas malpli da spaco ol la duono de tiu, kiun infano okupus se enpakita en skatolon de ĉiudimensiaj tri futoj.”

Jen la vivoĝuo de la infanoj ĝis la dekdua aŭ dekkvara vivojaro. La mizeraj, brutigitaj gepatroj strebas nur kiom eble plej profiti el la infanoj. Elkreskintaj, la infanoj kompreneble fajfas pri la gepatroj kaj forlasas ilin.

> „Ne mirige ke nescio kaj malvirto superfluas en tiel bredita loĝantaro. … Ilia moralo staras sur la plej malalta ŝtupo … Granda nombro da virinoj havas eksteredzajn infanojn kaj kelkaj en tiom malmatura aĝo ke eĉ tiuj, kiuj estas familiaraj kun krimstatistikoj, estas mirfrapitaj.”[304]

Kaj hejmlando de tiuj modelaj familioj, kiel diras la grafo Montalembert, certe profunda konanto de kristanismo, estas Anglio, la plej kristana lando de Eŭropo!

La salajro, entute jam mizera en la ĵus pritraktitaj industribranĉoj (la esceptokaza maksimuma salajro de la infanoj en la pajloplektaj lernejoj: 3 ŝilingoj semajne), estas premata ankoraŭ profunde sub sia normalo per la sistemo disvastiĝinta ĉefe en la puntdistriktoj, la sistemo de interŝanĝo aŭ de pagado per varoj.[305]

## *d) Transiro de la moderna manufakturo kaj hejmlaboro al la granda industrio. Rapidigo de tiu revolucio per aplikado de la fabrikleĝoj al tiuj industrioj*

La malkarigo de la laborforto per nura misuzo de inaj kaj nematuraj laborfortoj, nura rabo de ĉiaj normalaj labor- kaj viv-kondiĉoj kaj nura brutaleco de la tro- kaj nokt-laboro, trafas fine al certaj ne plu transireblaj naturaj baroj, kaj kun tiuj ankaŭ al la plikarigo de la varoj kaj de la kapitalisma ekspluatado entute, kiuj baziĝas sur ili. Por atingi tiun punkton

304 Saml., p. XL, XLI.

305 „*Child. Empl. Comm., I. Rep.*”, 1863, p. 185.

necesas multa tempo; tiam sonas la horo por enkonduko de maŝinoj kaj por nun rapida transformado de la disa hejmlaboro (aŭ de la manufakturo) en fabriksistemon.

La plej kolosa ekzemplo de tiu movado estas la produktado de *wearing apparel* (akcesoraĵoj por kostumo). Laŭ la klasado de la reĝa komisiono taskita enketi pri dungo de virinoj kaj de infanoj, tiu industrio entenas faristojn de pajloĉapeloj kaj virinĉapeloj, de ĉapoj, de ĉemizoj, tajlorojn, modistinojn, kudristinojn, gantfaristojn, korsetfaristojn, ŝuistojn kaj multajn akcesoraĵ-branĉetojn kiel fabrikadon de kravatoj, de kolumoj ktp. La ina personaro okupata en Anglio kaj Kimrio en tiuj industrioj estis en 1861: 586.298, el kiuj almenaŭ 115.242 estis malpli ol dudekjaraĝaj kaj 16.560 sub 15 jaroj. La nombro da tiuj laboristinoj en la Unuiĝinta Reĝlando estis en 1861: 750.334. La nombro da viraj laboristoj en Anglio kaj Kimrio samtempe okupataj en ĉapel-, ŝu-, gant-farado kaj tajlorado estis: 437.969, el kiuj 14.964 estis malpli ol 15-jaraĝaj, 89.285 estis dekkvin- ĝis dudek-jaraj. En tiu indiko mankas multaj pli malgrandaj branĉoj kiuj apartenas al tiu kategorio. Sed se ni prenas la nombrojn tiaj kiaj ili estas tie, tiam rezultiĝas nur por Anglio kaj Kimrio, laŭ la nombr-ado de 1861, sumo de 1.024.267 personoj, do proksimume tiom kiom sorbas la kampkulturado kaj bredado. Oni ekkomprenas por kio la maŝin-aro helpas elsorĉi tiom gigantajn produkt-amasojn kaj „liberigi el la laboro” tiom gigantajn amasojn da laboristoj.

La produktado de la vestaĵ-artikloj estas farata de manufakturoj, kiuj ene de si reproduktas nur la labordividon kies disajn erojn ili trovis jam pretaj; de malgrandaj metiaj majstroj, kiuj produktas tamen ne kiel antaŭe por individuaj konsumontoj, sed por manufakturoj kaj magazenoj, tiel ke ofte tutaj urboj kaj regionoj praktikas tiujn branĉojn, kiel ŝufaradon ktp, kiel specialaĵon; fine, en pli granda amplekso, de tiel nomataj hejmlabor-istoj, kiuj konsistigas la eksteran departementon de la manufakturoj, magazenoj kaj eĉ de la pli malgrandaj majstroj.[306]

La amason de la labormaterialo, krudmaterialo, duonfabrikaĵoj ktp liveras la granda industrio; la amaso de la malkara hommaterialo, elmetita al arbitra elsuĉado, konsistas el la laboristoj kiujn la granda industrio kaj kampkulturo „liberigis”. La manufakturoj de tiu sfero dankas sian originon ĉefe al la bezono de la kapitalistoj disponi batalpretan armeon

306 En Anglio, ĉio kio koncernas modajn vestaĵojn kaj akcesoraĵojn estas praktik-ata plej ofte en la konstruaĵoj de la dungistoj, parte de tie loĝantaj kaj dungitaj laboristinoj, parte de ekstere loĝantaj taglaboristinoj.

adapteblan al ĉia moviĝo de la postulo.[307] Sed tiuj manufakturoj lasis apud si plu ekzisti la disan metian hejmindustrion kiel larĝan bazon.

La granda produktado de plusvaloro en tiuj laborbranĉoj, samtempe kun la iom-post-ioma malkarigo de ĝiaj artikloj, estis kaj estas ĉefe ŝuldata al la minimuma salajro deviganta al mizera vegetado, lige kun la maksimumo da home ebla labortempo. Estis ĝuste la malkareco de la homŝvito kaj homsango transformitaj en varon, kiu konstante larĝigis la vendmerkaton kaj ĉiutage etendas ĝin, por Anglio speciale ankaŭ la kolonian merkaton, kie krome antaŭregas anglaj kutimo kaj gusto. Fine venis decida momento. La bazo de la malnova metodo – nur brutala ekspluatado de la laborist-materialo, pli aŭ malpli akompanata de sisteme disvolvita labordivido – jam ne sufiĉis al la kreskanta merkato kaj al la ankoraŭ pli rapide kreskanta konkurenco de la kapitalistoj. Venis la horo de la maŝino. La decide revolucia maŝino, kiu same akaparas ĉiujn sennombrajn branĉojn de tiu produktada sfero, kiel modistina laboro, tajlorado, ŝufarado, kudrado, ĉapelfarado ktp, estas – la kudromaŝino.

Ties rekta efiko sur la laboristo estas proksimume tiu de ĉia maŝino, kiu en la periodo de la granda industrio konkeras novajn branĉojn. Infanoj en plej frua aĝo estas forigitaj. La salajro de la maŝinlaboristoj kreskas proporcie al tiu de la hejmlaboristoj, el kiuj multaj apartenas al la „plej malriĉaj el la malriĉuloj”. La salajro de la pli bonstataj metiistoj, kun kiuj la maŝino konkurencas, malkreskas. La novaj maŝinlaboristoj estas ekskluzive knabinoj kaj junaj virinoj. Kun helpo de la meĥanika forto ili neniigas la monopolon de la vira laboro en malfacilaj taskoj kaj forpelas el pli facilaj taskoj amasojn da maljunulinoj kaj junaj infanoj. La konkurenco, plejpotenca, eliminas la plej malfortajn manlaboristojn. La terura kresko de la malsatmorto (*death from starvation*) en Londono dum la lasta jardeko iras paralele kun la etendiĝo de la maŝinkudrado.[308] La novaj laboristinoj de la kudromaŝino, movata de ili mane kaj piede aŭ sole per la mano, sidante kaj stare, laŭ la pezo, grando kaj specialeco de la maŝino, elspezas grandan laborforton. Ilia laboro fariĝas malutila al la sano pro la

307 La komisaro White vizitis manufakturon por armevestaĵoj, kiu okupis de mil ĝis mil ducent personojn, preskaŭ ĉiuj inaj, ŝumanufakturon kun mil tricent personoj, el kiuj preskaŭ la duono estis infanoj kaj junuloj ktp. („*Child. Empl. Comm., II. Rep.*”, p. XLVII, n. 319)

308 Jen ekzemplo. La 26-an de februaro 1864, la semajna raporto de mortoj de la ĝenerala registro entenas kvin kazojn de malsatmorto. Samtage la *Times* raportas pri nova kazo de malsatmorto. Ses viktimoj de malsatmorto en unu semajno!

daŭro de la laborprocezo, kvankam ĝi estas plej ofte pli mallonga ol en la malnova sistemo. Ĉie, kie la kudromaŝino, ekzemple en la ŝu-, korsaĵ-, ĉapel-farado ktp, enkondukiĝas en jam mallarĝaj kaj troplenaj laborejoj, ĝi pliigas la kontraŭsanajn influojn.

> „La efiko", diras la komisaro Lord, „ĉe eniro en malaltajn laborejojn, kie kune laboras de tridek ĝis kvardek maŝinlaboristoj, estas neeltenebla … La varmego, parte ŝuldata al la gasfornoj por varmigi la gladilojn, estas terura … Eĉ en tiaj laborejoj, kie regas tiel nomataj moderaj laborhoroj, do de la oka matene ĝis la sesa vespere, ĉiutage regule tri aŭ kvar personoj svenas."[309]

La revolucio de la socia produktadmaniero, tiu necesa produkto de la revolucio de la produktadrimedo, okazas en granda pelmelo de transiraj formoj. Ili ŝanĝiĝas kun la amplekso en kiu la kudromaŝino jam akaparis iun aŭ alian industribranĉon; kun la daŭro dum kiu ĝi jam regas en ĝi; kun la antaŭaj kondiĉoj de la laboristoj; kun la supereco de la manufaktura, metia aŭ hejma reĝimo, la luprezo de la laborejoj[310] ktp. En la vestaĵindustrio ekz-e, kie la laboro estis plej ofte jam organizita, precipe per simpla kunlaborado, la kudromaŝino estas unue nur nova faktoro de la manufaktursistemo. En la tajlorado, ĉemizfarado, ŝufarado ktp ĉiuj formoj interkruciĝas. Jen la pura fabriksistemo. Tie la interaj dungistoj ricevas la krudmaterialon de la ĉefa kapitalisto kaj grupigas en „ĉambretojn" aŭ „subtegmentejojn" dek ĝis kvindek kaj eĉ pli da laboristoj ĉirkaŭ kudromaŝinojn. Fine kiel ĉe ĉia maŝinaro, kiu ne formas strukturitan sistemon, kaj uzebla en etformato, metiistoj aŭ hejmlaboristoj, kun propra familio aŭ kun alpreno de malmultaj fremdaj laboristoj, uzas ankaŭ kudromaŝinojn kiuj apartenas al ili mem.[311] En Anglio fakte antaŭregas nun la sistemo, en kiu la kapitalisto koncentras iom grandan nombron da maŝinoj en siaj konstruaĵoj kaj poste disdonas la maŝinprodukton por plia prilaborado al la armeo de hejmlaboristoj.[312]

La diverseco de la transiraj formoj tamen ne kaŝas la tendencon al

---

309 „*Child. Empl. Comm., II. Rep.*", 1864, p. LXVII, n. 406-409; p. 84, n. 124; p. LXXIII, n. 441; p. 68, n. 6; p. 84, n. 126; p. 78, n. 85; p. 76, n. 69; p. LXXII, n. 438.

310 „La luprezo de la laborejoj ŝajnas esti la faktoro kiu fine decidas, kaj sekve en la ĉefurbo plej longe konserviĝis kaj plej rapide restariĝis la malnova sistemo, en kiu oni donis laboron al malgrandaj entreprenistoj kaj familioj." (saml., p. 83, n. 123)

311 En la ganto-farado ktp, kie la situacio de la laboristo apenaŭ distingeblas de tiu de la mizerulo, tio ne okazas.

312 Saml., p. 83, n. 122.

transformiĝo en veran fabriksistemon. Tiu tendenco nutriĝas el la karaktero de la kudromaŝino mem, kies diversa uzebleco instigas al kunigo de antaŭe disaj branĉoj en la saman konstruaĵon kaj sub la saman komandon de la sama kapitalo. Ĝi estas favorata ankaŭ de la cirkonstanco ke prepara kudrolaboro, kaj certaj aliaj operacioj, plej taŭge fareblas ĉe la loko de la maŝino; fine de la neevitebla eksproprietigo de la metiistoj kaj hejmlaboristoj, kiuj produktas per propraj maŝinoj. Tiu sorto atingis ilin parte jam nun. La ĉiam kreskanta amaso de kapitalo investita en kudromaŝinojn[313] spronas la produktadon kaj kreas merkatajn ŝtopiĝojn, kiuj instigas la hejmlaboristojn vendi siajn kudromaŝinojn. La superproduktado de tiaj maŝinoj mem devigas ties vendobezonajn produktistojn prunti ilin je semajna luprezo, kaj per tio kreas konkurencon mortigan por la malgrandaj maŝinposedantoj.[314] Ĉiam ankoraŭ daŭra ŝanĝado de konstrumodelo kaj malkarigo de la maŝinoj same konstante malpliigas la valoron de la malnovaj ekzempleroj kaj kondukas al tio ke ili profitige uzeblas jam nur amase, aĉetite je ridindaj prezoj, en la mano de grandaj kapitalistoj. Fine la anstataŭigo de la homo per la vapormaŝino, ĉi tie kiel en ĉiuj similaj revoluciaj procezoj, estas decida. La aplikado de vaporforto trafas komence sur pure teĥnikajn malhelpojn, ekzemple skuiĝo de la maŝinoj, malfacilo regi ilian rapidon, rapida malboniĝo de la pli malpezaj maŝinoj ktp – ĉiuj ĉi estas malhelpoj kiujn la sperto baldaŭ instruas superi.[315] Dum unuflanke la koncentriĝo de multaj labormaŝinoj en iom grandaj manufakturoj pelas al uzado de vaporforto, aliflanke la konkurenco de la vaporo al homaj muskoloj rapidigas la koncentriĝon de laboristoj kaj de labormaŝinoj en grandaj fabrikoj. Tiel Anglio spertas nun en la kolosa produktadsfero de vestaĵ-artikloj, kaj en la plej multaj aliaj branĉoj, la transformadon de la manufakturo, de la metio kaj de la hejmlaboro en fabriksistemon, post kiam ĉiuj ĉi formoj, sub influo de la granda industrio jam tute ŝanĝitaj kaj malkomponitaj, estis jam delonge reproduktintaj kaj eĉ troigintaj ĉiajn monstraĵojn de la fabriksistemo, sen partopreni en ajna el ties elementoj de socia progreso.[316]

313 En la ŝufarejo nur de Leicester, kiu produktas por la pogranda vendo, oni uzis en 1864 jam okcent kudromaŝinojn.

314 Saml., p. 84, n. 124.

315 Ekzemple en la magazeno de arme-vestaĵoj, Londono, en la ĉemizfabriko de Tillie kaj Henderson en *Londonderry*, en la vestaĵfabriko de la firmao Tait en Limeriko, kiu laborigas proksimume 1.200 „manojn”.

316 „La tendenco al la fabriksistemo.” (saml., p. LXVII) „La tuta ĉi industrio troviĝas nun en transira stadio kaj spertas la samajn ŝanĝojn, kiujn spertis ankaŭ la puntindustrio, la teksado ktp.” (saml., n. 405) „Kompleta revolucio.”

Tiu sponte okazanta industria revolucio estas akcelata de la etendo de la fabrikleĝoj al ĉiuj industribranĉoj, en kiuj laboras virinoj, junuloj kaj infanoj. La deviga regulado de la labortago laŭ longeco, paŭzoj, komenca kaj fina punkto, relajsosistemo por infanoj, la ekskludo de ĉiuj infanoj sub certa aĝo ktp, unuflanke necesigis plian maŝinaron[317] kaj anstataŭigon de muskoloj per vaporo kiel movforto.[318] Aliflanke, por gajni space tion kion oni perdas tempe, okazas pliigo de la komune uzataj produktadrimedoj, de la fornoj, konstruaĵoj ktp, do unuvorte pli granda koncentriĝo de la produktadrimedoj kaj proporcie pli granda koncentriĝo de laboristoj. La pasie ripetata ĉefa kontraŭargumento de ĉiu manufakturo minacata de la fabrikleĝo estas efektive la neceso de pli granda kapitalelspezo por daŭrigi la produktadon en la antaŭa amplekso. Sed koncerne la hejmlaboron kaj interajn formojn inter manufakturo kaj hejmlaboro, la senbara ekspluatado de malkaraj laborfortoj estas la sola bazo de ilia konkurenckapablo. Ilia bazo forvaporiĝas kun la limigo de la labortago kaj de la infanlaboro.

Esenca kondiĉo de la fabriksistemo, speciale ekde kiam ĝi estas submetita al la regulado de la labortago, estas normala sekureco de la rezulto, do de produktado de certa kvanto da varo aŭ de celata uzefiko en donita tempo. La laŭleĝaj paŭzoj de la reguligita labortago supozigas krome ke subita kaj perioda haltigo de la laboro okazas sen malutilo por la produktata produkto. Tiu sekureco de la rezulto kaj de la interrompeblo de la laboro atingeblas kompreneble en pure meĥanikaj industrioj pli facile ol tie, kie ĥemiaj kaj fizikaj procezoj ludas rolon, ekz-e en potfarado, blankigejo, bakejo, en la plej multaj metalmanufakturoj.

---

(saml., p. XLVI, n. 318) En la epoko de la „*Child. Emp. Comm.*” de 1840 la ŝtrumpfarado estis ankoraŭ manlaboro. Ekde 1846 oni enkondukis diversan maŝinlaboron, nun movata de vaporo. La ĉioma nombro de la gepersonoj de ĉiaj aĝoj ekde la 3-a vivojaro okupataj en la angla ŝtrumpfarado estis en 1862 proksimume 120.000. El tiuj, laŭ la *Parliamentary Return* de la 11-a de februaro estis en 1862 tamen nur 4.063 submetitaj al la fabrikleĝo.

317 Ekz-e en la potfarado la firmao Cochran de la „Britannia Pottery, Glasgow” raportas: „Por konservi nian produktokvanton, ni uzas nun en multe pli granda amplekso maŝinojn, kiujn servas nelernintaj laboristoj, kaj ĉiu tago konvinkas nin ke ni povas produkti pli grandan kvanton ol laŭ la malnova maniero.” („*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*”, p. 12) „La efiko de la fabrikleĝo estas ke ĝi pelas al plia enkonduko de maŝinoj.” (saml., p. 13, 14)

318 Ekz-e post enkonduko de la fabrikleĝo en la potfarado [oni konstatas] grandan pliiĝon de la torndiskoj movataj per vaporo (*power jiggers*) anstataŭ tiuj movataj mane (*handmoved jiggers*).

La rutino de la senlima labortago, de noktlaboro kaj de libera homruinigo kaŭzis ke ĉia natura malhelpo estis konsiderata kiel eterna „natura baro” de la produktado. Nenia veneno mortigas fiinsektojn pli sekure ol la fabrikleĝo tiajn „naturajn barojn”. Neniu lamentis pli laŭte pri la „malebloj” ol la sinjoroj de la potfarado. En 1864 oni trudis al ili la fabrikleĝon, kaj ĉiuj malebloj estis jam dek ses monatojn poste malaperintaj.

> „La plibonigita metodo”, kaŭzita de la fabrikleĝo, „fari potfaristan kaĉon (slip) per premo anstataŭ per elvaporigo, la nova konstruformo de la fornoj por sekigi la nebruligitan varon ktp estas okazaĵoj de granda graveco en la potfara arto kaj konsistigas ties progreson tian kian la lasta jarcento ne aperigis. … La temperaturo de la fornoj estas konsiderinde malaltigita, kun konsiderinda malpliigo de la karbokonsumo kaj pli rapida efiko sur la varo.”[319]

Spite al ĉiaj profetaĵoj la kostoprezo de tiu tera varo ne altiĝis, sed ja la produktokvanto, tiel ke la eksporto de la dek du monatoj de decembro 1864 ĝis decembro 1865 rezultigis valorkromaĵon de 138.628 sterlingaj pundoj super la mezumon de la tri antaŭaj jaroj. En la fabrikado de alumetoj oni konsideris naturleĝo ke knaboj, eĉ dum vorado de sia tagmeza manĝaĵo, trempas la lignaĵojn en varman fosforaĵon, kies venena vaporo iras al ili en la vizaĝon. Kun la neceso ŝpari tempon, la fabrikleĝo (1864) trudis trempmaŝinon (*dipping machine*), kies vaporoj ne povas atingi la laboriston.[320]

Same oni aŭdas ankoraŭ nun en la branĉoj de puntmanufakturo ankoraŭ ne submetitaj al la fabrikleĝo, ke la manĝoj ne povas esti regulaj, pro la diversaj daŭroj kiujn diversaj puntmaterialoj bezonas por sekiĝi kaj kiuj povas varii de tri minutoj ĝis unu horo.

Al tio la komisaroj de la enketo pri dungo de infanoj kaj virinoj en la industrio respondas:

> „La cirkonstancoj estas la samaj kiel en la tapetpresado. Kelkaj el la ĉefaj fabrikistoj en tiu branĉoj vigle argumentis ke la naturo de la uzataj materialoj kaj la diverseco de la procezoj kiujn ili trairas permesas sen granda perdo nenian subitan haltigon de la laboro por manĝoj … Per la 6-a klaŭzo de la 6-a sekcio de la Leĝo por etendo de la fabrikleĝo” (*Factory Acts Extension*, 1864) „oni permesis al ili dekokmonatan templimon ekde la ekvalido de la leĝo, post

319 „*Rep. Insp. Fact., 31st Oct. 1865*”, p. 96 kaj 127.

320 La enkonduko de tiu kaj de aliaj maŝinoj en la produktadon de alumetoj anstataŭigis en unu el ties departementoj 230 junulojn per 32 geknaboj de 14 ĝis 17 jarojn aĝaj. Tia ŝparado de laboristoj estis en 1865 daŭrigata per uzado de vaporforto.

kiu ili devas konformiĝi al la manĝhoroj indikitaj de la fabrikleĝoj."[321]

La leĝo estis apenaŭ akirinta parlamentan sankcion, kiam la sinjoroj fabrikistoj malkovris:

> „La misoj, kiujn ni atendis de la enkonduko de la fabrikleĝo, ne okazis. Ni ne trovas ke la produktado estas iel paralizita. Fakte ni produktas pli en la sama tempo."[322]

Oni vidas, ke la angla parlamento, al kiu certe neniu riproĉus geniecon, per sperto venis al la kompreno ke trudleĝo povas simple fordikti ĉiajn tiel nomatajn naturmalhelpojn de la produktado. Ĉe la enkonduko de fabrikleĝo en industribranĉo oni fiksas do templimon de ses ĝis dek ok monatoj, ene de kiuj la fabrikisto povas forigi ĉiajn teĥnikajn malhelpojn. La vorto de Mirabeau „Malebla? Neniam diru al mi tiun stultan vorton!" validas speciale por la moderna teĥnologio. Sed se la fabrikleĝo tiamaniere forceje maturigas la materiajn elementojn necesajn por transformi la manufaktursistemon en la fabriksistemon, tiam ĝi samtempe rapidigas per la neceson de pli granda kapitalelspezo la subiron de la malgrandaj majstroj kaj la koncentriĝon de la kapitalo.[323]

Sendepende de la pure teĥnikaj kaj teĥnike forigeblaj malhelpoj, la regulado de la labortago trafas sur malregulajn kutimojn de la laboristoj mem, speciale kie antaŭregas popeca salajro kaj kie perdita tempo dum parto de tago aŭ de semajno reatingeblas per posta trolaborado aŭ nokta laboro, metodo, kiu brutaligas la plenkreskan laboriston kaj ruinigas liajn junajn kaj inajn kamaradojn.[324]

321 „*Child. Empl. Comm., II. Rep.*", 1864, p. IX, n. 50.

322 „*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*", p. 22.

323 „La necesaj plibonigoj … ne enkondukeblas en multaj malnovaj manufakturoj sen kapitalelspezo kiu superas la rimedojn de multaj nunaj posedantoj … Provizora malorganiziĝo akompanas necese la enkondukon de la fabrikleĝoj. La amplekso de tiu malorganiziĝo staras en rekta proporcio al la grando de la forigendaj malbonaĵoj." (saml., p. 96, 97)

324 Ĉe la altfornoj ekz-e „oni je la fino de la semajno ĝenerale forte etendas la labortempon, pro la kutimo de la laboristoj libertempi lunde kaj okaze, parte aŭ tute ankaŭ marde". („*Child. Empl. Comm., III. Rep.*", p. VI) „La malgrandaj majstroj havas ĝenerale tre malregulan labortempon. Ili perdas du aŭ tri tagojn, kaj poste ili laboras la tutan nokton por reakiri la perditon … Ili laborigas ĉiam siajn proprajn infanojn, se ili havas iajn." (saml., p. VII) „La manko de reguleco ĉe la laborkomenco, kiu estas favorata de la ebleco kaj la kutimo reatingi per trolaborado la perditon." (saml., p. XVIII) „Giganta tempo perdiĝis en Birminghamo … per tio ke ili pigris parton de la tempo, kaj en la restanta tempo sklavece laboregis." (saml., p. XI)

Kvankam tiu malreguleco en elspezo de la laborforto estas natura kaj brutala reago kontraŭ la enuo de monotona laborado, ĝi fontas tamen en senkompare pli alta grado el la anarĥio de la produktado mem, kiu siavice premisas la senbridan ekspluatadon de la laborforto fare de la kapitalo. Apud la ĝeneralaj periodaj variaĵoj de la industria ciklo kaj la apartaj merkataj fluktuadoj en ĉiu produktad-branĉo ekzistas ankoraŭ tio kion oni nomas sezono, kiu dependas aŭ de la periodeco de favora ŝipnavigado aŭ de la modo, kaj la subiteco de grandaj kaj plej rapide plenumendaj mendoj. La kutimo fari tiajn mendojn oftiĝas kun la etendiĝo de fervojoj kaj de telegrafio.

> „La etendiĝo de la fervojsistemo”, diras ekz-e londona fabrikisto, „tra la tuta lando tre kuraĝigis fari mallongajn mendojn. Aĉetantoj venas nun el Glasgo, Manĉestro kaj Edinburgo unufoje en du semajnoj aŭ por pogranda aĉeto al la magazenoj de la urbocentro, al kiuj ni liveras la varojn. Ili faras mendojn kiuj estas tuj plenumendaj, anstataŭ aĉeti de stokejoj, kio estis antaŭe kutima. En antaŭaj jaroj ni ĉiam kapablis antaŭlabori en trankvilaj momentoj por la venonta sezono; sed hodiaŭ neniu povas antaŭvidi kiu artiklo estos postulata en la sezono.”[325]

En la fabrikoj kaj manufakturoj ankoraŭ ne submetitaj al la fabrikleĝo regas periode la plej terura trolaborado dum la tiel nomata sezono, kiam alvenas subitaj mendoj. En la ekstera departemento de la fabriko, de la manufakturo kaj de la magazeno, do en la sfero de la hejmlaboro, jam sen tio sufiĉe malregula, la laboristo dependas pri sia krudmaterialo kaj siaj mendoj tute de la kapricoj de la kapitalisto, kiun ĉi tie bridas nenia konsidero pri konstruaĵoj, maŝinoj ktp kaj kiu riskas ĉi tie nenion alian ol la haŭton de la laboristoj mem. Tiel ĉi tie sisteme brediĝas ĉiam disponebla industria rezervarmeo, el kiu dum parto de la jaro la troa laboro kaŭzas multajn viktimojn kaj kiun la senlaboreco en la alia parto de la jaro mizerigas.

> „La entreprenistoj”, diras la *Child. Empl. Comm.*, „ekspluatas la kutiman malregulecon de la hejmlaboro, kiam subite venas kromaj mendoj, tiel ke la laboro etendiĝas ĝis la 11-a, kaj la 12-a nokte aŭ ĝis la 2-a matene, aŭ, kiel oni kutime diras, ‘ĉiuhore’”, kaj tio en ejoj „kie la fetoro sufiĉas por svenigi vin (*the stench is enough to knock you down*). Vi iras eble ĝis la pordo kaj malfermas ĝin, sed resaltas pro hororo.”[326]

325„*Child. Empl. Comm., IV. Rep.*”, p. XXXII. „La etendo de la fervojsistemo laŭdire tre kontribuis al tiu kutimo fari subitajn mendojn; por la laboristoj rezultas el tio hasto, neglekto de manĝotempoj kaj kromaj laborhoroj.” (saml., p. XXXI)

326„*Child. Empl. Comm., IV. Rep.*”, p. XXXV, n. 235 kaj 237.

> „Estas stranguloj, niaj entreprenistoj”, diras unu el la aŭskultataj atestantoj, ŝuisto, „ili kredas ke ne malutilas al knabo, se li dum duonjaro tro forte laboras kaj dum la alia duono estas preskaŭ devigata vagabondi.”[327]

Same kiel la supre menciitaj teĥnikaj malhelpoj, tiuj praktikoj kiujn la rutino de la aferoj enradikigis (*usages which have grown with the growth of trade*) estis kaj ankoraŭ estas prezentataj de interesitaj kapitalistoj kiel „naturaj baroj” de la produktado. Tio estis la preferata protestkrio de la la kotonmastroj ekde kiam la fabrikleĝo minacis ilin. Kvankam ilia industrio baziĝas pli ol ĉiu alia sur la mondmerkato kaj do sur ŝipveturado, la sperto malkonfirmis tion. Ekde tiam, la anglaj fabrikinspektistoj traktas ĉian tiel nomatan „afer-malhelpon” kiel vanan pretekston.[328]

La tre skrupulaj enketoj de la *Child. Empl. Comm.* pruvas fakte ke en kelkaj industrioj la regulado de la labortago nur distribuis pli regule sur la tutan jaron la jam antaŭe uzatan kvanton de laboro[329], ke tiu regulado estas la unua racia brido por la hommurdaj, frivolaj kapricoj de la modo malkongruaj kun la sistemo de la granda industrio[330], ke la evoluo de la transoceana ŝipveturado kaj de la komunikiloj entute forigis la veran kaŭzon de la sezonlaboro[331], ke ĉiuj aliaj laŭdire nekontroleblaj cirkonstancoj estas forigataj per kromaj konstruaĵoj, kromaj maŝinoj, pli granda nombro da samtempe okupataj laboristoj[332] kaj per la reefiko de

327 Saml., p. 127,n. 56.

328 „Koncerne la perdon kiu estiĝas al la komerco pro ne sufiĉe frua plenumado de la mendoj, mi memoras ke tiu estis la favorata argumento de la fabrikestroj en la jaro 1832. Nenio, kio direblas pri tiu temo, povus esti same grava kiel tiam, kiam la vaporo ankoraŭ ne duonigis ĉiujn distancojn kaj enkondukis novajn reguladojn de la trafiko. Tiu aserto tiam ne rezistis al la testo, kaj certe nek hodiaŭ.” („*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1862*”, p. 54, 44)

329 „*Child. Empl. Comm., III. Rep.*”, p. XVIII, n. 118.

330 John Bellers rimarkigas jam en 1699: „La malcerteco de la modo grandigas la nombron de la malriĉuloj suferantaj mizeron. Ĝi enhavas du grandajn malbonaĵojn: 1-e la submastroj suferas mizeron dum la vintro pro manko de laboro, ĉar la komercistoj de tajloraĵoj kaj la teksmastroj ne kuraĝas elspezi kapitalon por laborigi submajstrojn antaŭ la printempo kiam ili scias kia estos tiam la modo; 2-e dum la printempo ne estas sufiĉe da submajstroj, tiel ke la teksmajstroj devas venigi multajn metilernantojn por povi provizi la komercon de la reĝlando en kvarona aŭ duona jaro, per kio la kampulo forlasas la plugilon, la kamparo seniĝas je laboristoj, la urboj pleniĝas grandparte de almozpetantoj kaj kelkaj, kiuj hontas almozpeti, estas dum la vintro elmetitaj al la malsatmorto.” „*Essays about the Poor, Manufacturers etc*”, p. 9)

331 „*Child. Empl. Comm., V. Rep.*”, p. 171, n.34.

ĉiuj ĉi ŝanĝoj sur la sistemon de la pogranda komerco.[333] Tamen la kapitalo, kiel ĝi deklaras ripete tra la buŝo de unu el siaj reprezentantoj, pretas al tia transformego *„nur sub la premo de ĝenerala parlamenta leĝo"*[334], kiu per leĝa devigo reguligas la labortagon.

## 9. Fabrikleĝaro (klaŭzoj pri sano kaj edukado). Ĝia ĝeneraligo en Anglio

La fabrikleĝaro, tiu unua konscia kaj laŭplana reefiko de la socio sur la spontan formon de ĝia produktadprocezo, estas, kiel ni vidis, same necesa produkto de la granda industrio kiel kotonfadeno, la *self-actor* kaj la elektra telegrafo. Antaŭ ol transiri al ĝia ĝeneraligo en Anglio, ni devas ankoraŭ mencii kelkajn klaŭzojn de la angla fabrikleĝo kiuj ne koncernas la horaron de la labortago.

La sanregulado, cetere redaktita tiel ke la kapitalisto povu facile ĉirkaŭiri ĝin, estas ekstreme magra, efektive limigita al preskriboj blankigi la vandojn kaj al kelkaj kromaj disponoj de pureco, ventumado kaj protekto kontraŭ danĝeraj maŝinoj.

Ni revenos en la Tria Libro al la fanatika batalo de la fabrikestroj kontraŭ tiu klaŭzo kiu trudas al ili malaltan elspezon por la protekto de la membroj de iliaj „manoj". Tiu kontraŭstaro de la fabrikestroj ĵetas denove lumon sur la liberkomercan dogmon, laŭ kiu en socio de antagonismaj

332 Ekz-e en la eldiroj de atestantoj de eksportkomercistoj el Bradfordo legeblas: „Sub tiuj cirkonstancoj estas klare, ke oni jam ne bezonas laborigi knabojn pli longe ol de la 8-a matene ĝis la 7-a aŭ 7-a kaj duono vespere en la varmagazenoj. Tio estas nur demando de kroma elspezo kaj de kromaj manoj. La knaboj ne bezonus labori ĝis tiom profunde en la nokto, se kelkaj entreprenistoj ne estus tiom profitavidaj; kroma maŝino kostas nur 16 aŭ 18 sterlingajn pundojn … Ĉiuj malfacilaĵoj fontas el nesufiĉaj instalaĵoj kaj manko de spaco." (saml., p. 171, n. 35, 36 kaj 38)

333 Saml., [p. 81, n. 32] Londona fabrikisto, kiu cetere konsideras la devigan reguladon de la labortago kiel protektilon de la laboristoj kontraŭ la fabrikistoj kaj de la fabrikistoj mem kontraŭ la pogranda komerco, eldiras: „La premo en nia afero estas kaŭzata de la transportistoj, kiuj volas ekz-e transporti varon per velŝipo por ĉeesti por certa sezono surloke kaj samtempe enpoŝigi la transportdiferencon inter velŝipo kaj vaporŝipo, aŭ kiuj elektas inter du vaporŝipoj la pli fruan, por aperi antaŭ iliaj konkurantoj sur la ekstera merkato."

334 „Tio ŝanĝeblus", diras fabrikestro, „surkoste de ampleksigo de la laborejoj sub la premo de ĝenerala parlamenta leĝo." (saml., p. X, n. 38)

interesoj ĉiu progresigas la ĝeneralan intereson per tio ke li serĉas sian personan intereson! Unu ekzemplo sufiĉas. Oni scias ke dum la lastaj dudek jaroj en Irlando la linindustrio tre evoluis, kaj kun ĝi la *scutching mills* (fabrikoj por bati kaj rompi la linfibrojn). En la jaro 1864 tie ekzistis proksimume 1.800 tiaj fabrikoj. Periode en aŭtuno kaj vintro oni tie venigas el la kamplaboro junulojn kaj virinojn, la gefilojn kaj edzinojn de la najbaraj farmistoj, ĉiuj tute sensciaj pri maŝinoj, por nutri la rompmaŝinojn de tiuj *scutching mills* per linfibroj. La akcidentoj estas amplekse kaj intense tute senprecedencaj en la historio de la maŝinoj. Unu sola *scutching mill* en *Kildinan* (apud Korko) kaŭzis de 1852 ĝis 1856 ses mortigajn akcidentojn kaj sesdek gravajn kripligojn; ĉiujn ĉi akcidentojn oni povintus eviti per plej simplaj instalaĵoj je la prezo de malmultaj ŝilingoj. D-ro W. White, la *certifying surgeon* (oficiala ĥirurgo) de la fabrikoj en *Downpatrick*, deklaras en oficiala raporto de la 16-a de decembro 1865:

> „La akcidentoj en la *scutching mills* estas plej teruraj. En multaj kazoj kvarono de la korpo estas deŝirata de la trunko. Morto aŭ estonteco de mizera malkapablo kaj sufero estas kutimaj sekvoj de la vundoj. La pliiĝo de la fabrikoj en tiu ĉi lando kompreneble pliigos tiujn hororajn rezultojn. Mi estas konvinkita ke per taŭga ŝtata superrigardo de la *scutching mills* eviteblas grandaj perdoj de korpoj kaj de vivoj.”[335]

Kio povus pli bone karakterizi la kapitalisman produktadmanieron ol la neceso trudi al ĝi ŝtate per deviga leĝo la plej simplajn instalaĵojn de pureco kaj de sano?

> „La fabrikleĝo de 1864 blankigis kaj purigis en la potfarejoj pli ol 200 laborejojn, post dudekjara aŭ tuta abstino je tia operacio” (jen la „abstinemo” de la kapitalo!), „en lokoj kie 27.878 laboristoj estas okupataj kaj kiuj ĝis tiam, dum troa tag- kaj nokt-laboro, enspiris haladzan atmosferon, kiu donis al alie kompare sendanĝeran laboron la ĝermojn de malsano kaj de morto. La leĝo tre pliigis la ventumilojn.[336]

Samtempe tiu branĉo de la fabrikleĝo klare montris ke la kapitalisma produktadmaniero laŭ sia esenco trans certa punkto ekskludas ĉian racian plibonigon. Oni ripete rimarkigis ke la anglaj kuracistoj unuanime deklaras po kvincent kubikfutojn por ĉiu persono apenaŭ sufiĉa minimuno ĉe konstanta laborado. Nu bone! Se la fabrikleĝo malrekte per ĉiaj siaj devigaj reguloj rapidigas la transformadon de malgrandaj laborejoj en fabrikojn, pro tio malrekte intervenas en la proprietan rajton de la mal-

335 Saml., p. XV, n. 72 sj.

336 „*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*”, p. 127.

grandaj kapitalistoj kaj certigas la monopolon al la grandaj, tiam la leĝa altrudo de la necesa aerspaco por ĉiu laboristo en la laborejo unufrape kaj rekte eksproprietigus milojn da malgrandaj kapitalistoj! Ĝi atakus la radikon de la kapitalisma produktadmaniero, do la memvaloriĝon de la kapitalo, granda kaj malgranda, kiu okazas per libera aĉeto kaj libera konsumado de la laborforto. Antaŭ tiuj 500 kubikfutoj da aero la fabrikleĝo perdas la spiron. La institucioj pri sano, la industriaj enketkomisionoj, la fabrikinspektistoj ripetas ade kaj ade la neceson de la 500 kubikfutoj kaj la maleblon trudi ilin al la kapitalo. Ili tiel deklaras efektive ftizon kaj aliajn pulmomalsanojn de la laboro vivkondiĉo de la kapitalo.[337]

Eĉ se la klaŭzoj pri edukado de la fabrikleĝo estas tre malmultaj, ili tamen proklamas la bazan instruadon kiel devigan kondiĉon de la laboro.[338] Ĝia sukceso unue pruvis la eblecon kunligi instruadon kaj gimnastikon[339] kun manlaboro, do ankaŭ de manlaboro kun instruado kaj gimnastiko. La fabrikinspektistoj baldaŭ malkovris el la atestantaj pridemandadoj de instruistoj, ke la fabrikinfanoj, kvankam ili ĝuas duone malpli da instruado ol la regulaj taglernantoj, lernas same multe kaj ofte eĉ pli.

> „La afero estas simpla. Tiuj, kiuj ĉeestas nur duonan tagon en la lernejo, estas ĉiam freŝaj kaj preskaŭ ĉiam kapablaj kaj emaj ricevi instruon. La sistemo de

337 Per sperto oni trovis ke sana mezuma individuo konsumas per ĉiu spiro de meza intenso proksimume 25 kubikcolojn da aero kaj ke li faras proksimume 20 spirojn minute. La aerkonsumo de individuo en 24 horoj estus do proksimume 720.000 kubikcoloj, aŭ 416 kubikfutoj. Sed oni scias ke jam enspirita aero jam ne povas servi por la sama procezo antaŭ ol esti purigita en la granda laborejo de la naturo. Laŭ la eksperimentoj de Valentin kaj Brunner, sana viro ŝajnas elspiri proksimume 1.300 kubikcolojn da karbona acido hore; tio ekvivalentus proksimume 8 uncojn da solida karbo, kiujn la pulmo elĵetas en 24 horoj. *„Ĉiu viro devus havi almenaŭ 800 kubikfutojn.”* (Huxley)

338 Laŭ la angla fabrikleĝo la gepatroj ne rajtas sendi infanojn malpli ol 14-jarajn en la „kontrolatajn” fabrikojn sen samtempa baza instruado. La fabrikestro respondecas pri plenumado de tiu leĝo. „Fabrikinstruado estas deviga, kaj ĝi apartenas al la laborkondiĉoj.” („*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*”, p. 111)

339 Pri la plej avantaĝaj sukcesoj de la kunligo de gimnastiko (por knaboj ankaŭ antaŭarmeaj ekzercoj) kun deviga instruado de la fabrikinfanoj kaj malriĉaj lernantoj vidu la paroladon de N. W. Senior en la 7-a jarkongreso de la „*National Association for the Promotion of Social Science*” en „*Report of Proceedings etc.*”, Londono, 1863, p. 63, 64, kaj same la raporton de la fabrikinspektistoj por la 31-a de oktobro 1865, p. 118, 119, 120, 126 sj.

duona laboro kaj duona lernado faras ĉiun el la du okupoj ripozo el la alia kaj sekve pli adaptita al la infano ol la seninterrompa daŭro de unu el la du. Knabo, kiu sidas de frumatene en la lernejo, kaj eĉ dum varmega vetero, tute ne povas konkuri kun alia, kiu venas vigle kaj maldorme el sia laboro."[340]

Pliaj atestoj troviĝas en la parolado de Senior en la sociscienca kongreso en Edinburgo 1863. Li montras krome interalie, ke la unuflanka neproduktiva kaj longa lernejtago de la infanoj de la altaj kaj mezaj klasoj senutile pliigas la laboron de la instruistoj, „dum li detruas tempon, sanon kaj energion de la infanoj ne nur sentime, sed absolute malutile".[341] El la fabriksistemo, kiel oni vidas detale ĉe Roberto Oveno, ĝermis la edukado de la estonteco, kiu kunligos por ĉiuj infanoj super certa aĝo produktivan laboron kun instruado kaj gimnastiko, ne nur kiel metodo por pliigi la socian produktadon, sed kiel la sola metodo por produktado de ĉiuflanke evoluintaj homoj.

Oni vidis, ke la granda industrio teĥnike forigas la manufakturecan labordividon kun ĝia vivolonga aneksado de tuta homo al detala operacio, dum samtempe la kapitalisma formo de la granda industrio reproduktas tiun labordividon ankoraŭ pli monstre: en la vera fabriko per transformado de la laboristo en la memkonscian aneksaĵon de parta maŝino, ĉie aliloke parte per sporada uzado de la maŝinoj kaj de la maŝinlaboro[342],

---

340 „*Reports of Insp. of Fact.*", l.c., p. 118, 119. Naiva silkfabrikestro deklaras al la enketkomisaroj de la „*Child. Emp. Comm.*": „Mi estas tute konvinkita ke la vera sekreto de la produktado de bravaj laboristoj estas trovita en la kunligo de laboro kun instruado ekde la infaneco. Kompreneble la laboro devas esti nek tro peniga nek naŭza nek malfavora al la sano. Mi dezirus ke miaj propraj infanoj havus laboron kaj ludon kiel ŝanĝoj de la lernejo." („*Child. Empl. Comm., V. Rep.*", p. 82, n. 36)

341 Senior, l.c., p. [65,] 66. Kiel la granda industrio sur certa grado de evoluo per la revolucio de la materia produktadmaniero kaj de la sociaj produktadkondiĉoj revolucias ankaŭ la kapojn, tion klare montras komparo inter la parolado de N. W. Senior de 1863 kaj lia polemikaĵo kontraŭ la fabrikleĝo de 1833, aŭ komparo de la opinioj de la menciita kongreso kun la fakto ke en certaj kamparaj partoj de Anglio estas al malriĉaj gepatroj daŭre malpermesate eduki siajn infanojn, je puno de malsatmorto. Ekzemple s-ro Snell raportas kiel kutima praktiko en Somersetŝiro, ke, kiam malriĉa persono petas helpon de la pastrejo, li estas devigata eligi siajn infanojn el la lernejo. Ekzemple s-ro Wollaston, pastro en Felthamo, rakontas pri kazoj, en kiuj oni rifuzis ĉian helpon al certaj familioj „ĉar ili sendas siajn knabojn al la lernejo"!

342 Kie metiaj maŝinoj, movataj per homforto, konkurencas rekte aŭ malrekte kun evoluinta maŝinaro kaj do bazita sur meĥanika movforto, okazas granda transformiĝo koncerne la laboriston kiu movas la maŝinon. Origine la vapor-

parte per enkonduko de virina, infana, nelerta laboro kiel nova bazo de la labordivido.

La kontraŭdiro inter la manufaktura labordivido kaj la metodoj de la granda industrio manifestiĝas perforte. Ĝi aperas interalie en la terura fakto ke granda parto de la infanoj okupataj en la modernaj fabrikoj kaj manufakturoj, de la plej frua aĝo forĝitaj al la plej simplaj manipuladoj, estas dum jaroj ekspluatataj sen lerni ian ajn laboron kiu igus ilin poste uzeblaj eĉ nur en la sama manufakturo aŭ fabriko. En la anglaj librepres-ejoj ekz-e okazis antaŭe transiro de la metilernantoj de plej facilaj al plej kompleksaj laboroj, konforme al la sistemo de la malnova manufakturo kaj de la metio. Ili trairis kurson ĝis kiam ili estis pretaj presistoj. Povi legi kaj skribi estis por ĉiuj postulo de la metio. Ĉio ĉi ŝanĝiĝis kun la presmaŝino. Tiu uzas du specojn de laboristoj: plenkreskan laboriston, la maŝingardiston, kaj maŝinknabon, plej ofte 11- ĝis 17-jaran, kies tasko konsistas ekskluzive en tio, submeti paperfolion al la maŝino aŭ depreni el ĝi la presitan folion. Ili faras, speciale en Londono, tiun laboraĉon dum 14, 15, 16 horoj seninterrompe dum kelkaj tagoj de la semajno kaj ofte 36 horojn sinsekve kun nur du horoj da paŭzo por manĝo kaj dormo![343] Granda parto da ili ne scias legi, kaj ili estas ĝenerale tute neglektitaj, malnormalaj kreitaĵoj.

> „Ne necesas ajna intelekta kulturo por adapti ilin al ilia tasko; ili havas malmultan okazon praktiki sian lertecon kaj eĉ malpli sian juĝkapablon; ilia salajro, kvankam sufiĉe alta por knaboj de ilia aĝo, ne kreskas proporcie al ilia kreskado, kaj malmultaj inter ili havas la perspektivon akiri la pli bone pagatan kaj pli respondecan postenon de maŝingardisto, ĉar la maŝino bezonas por kvar laboristoj nur unu gardiston."[344]

Kiam ili fariĝas tro maljunaj por sia infaneca laboro, do almenaŭ en la 17-a vivojaro, oni adiaŭas ilin el la presejo. Ili fariĝas rekrutoj de la

---

maŝino anstataŭis tiun laboriston, nun li devas anstataŭi la vapormaŝinon. La streĉado kaj elspezo de lia laborforto fariĝas do monstra, kaj nun eĉ por neplenkreskuloj, kiuj estas kondamnitaj al tia torturo! Ekz-e la komisaro Longe en *Coventry* kaj ties ĉirkaŭaĵo trovis 10-jarajn ĝis 15-jarajn knabojn uzatajn por turni ruband-teksilojn, sen paroli pri pli junaj infanoj kiuj devis turni teksilojn de pli malgranda dimensio. „Tio estas eksterordinare peniga laboro. La knabo estas nura anstataŭaĵo de vaporforto." („*Child. Empl. Comm., V. Rep. 1866*", p. 114, n. 6) Pri la teruraj sekvoj de „tiu sistemo de sklaveco", kiel la oficiala raporto nomas ĝin, vidu saml.

343 Saml., p. 3, n. 24.

344 Saml., p. 7, n. 59, 60.

krimo. Kelkaj provoj havigi al ili dungon aliloke, fiaskis pro ilia nescio, krudeco, korpa kaj spirita degradiĝo.

Kio ĝustas pri la manufaktura labordivido interne de la laborejo, tio ĝustas pri la labordivido interne de la socio. Tiom longe, kiom metio kaj manufakturo estas la ĝenerala bazo de la socia produktado, tiom longe la submetiĝo de la produktanto al unu sola produktadbranĉo, la disŝiro de lia origina multeco de okupiĝoj[345] estas necesa evoluelemento. Sur tiu bazo ĉiu aparta produktadbranĉo trovas empirie la formon kiu teĥnike taŭgas al ĝi, malrapide perfektigas ĝin kaj rapide kristaligas ĝin ekde kiam certa grado de matureco estas atingita. Kio ie kaj tie kaŭzas ŝanĝojn, estas krom nova labormaterialo, kiun la komerco liveras, la iom-post-ioma ŝanĝiĝo de la laborinstrumento. Post kiam la laŭsperte taŭga formo estas akirita, ankaŭ ĝi rigidiĝas, kion pruvas ĝia ofte jarmilojn daŭranta transiro el la mano de[346] unu generacio al tiu de la alia. Estas karakterize ke ĝis en la 18-a jarcento la apartaj branĉoj nomiĝis *mysteries* (*mystères* [misteroj]), en kies misteron povis penetri nur la empirie kaj profesie inicito. La granda industrio disŝiris la vualon kiu kaŝis al la homoj ilian propran socian produktadprocezon kaj kiu faris la diversajn sponte apartigitajn produktadbranĉojn enigmaj unu al la alia kaj eĉ al la inicito en ĉiu branĉo. Ĝia principo dissolvi ĉian produktadprocezon, per si mem kaj unue sen ajna konsidero al la homa mano, en ĝiajn konsistigajn elementojn, kreis la tute modernan sciencon de teĥnologio. La plej diversaj, ŝajne senkoheraj kaj rigidiĝintaj formoj de la socia produktadprocezo dissolviĝis en konscie laŭplanajn kaj laŭ la celata uzefiko sisteme apartigitajn aplikadojn de la natursciencо. La teĥnologio malkovris ankaŭ la malmultajn grandajn bazajn formojn de la moviĝo, en kiu ĉia produktiva agado de la homa korpo nepre okazas, spite al la varieco de la uzataj instrumentoj, tute same

345 „En kelkaj partoj de alta Skotlando … multaj ŝafistoj kaj kabanuloj (*cotters*) kun edzino kaj infano aperas, laŭ la Statistical Account, en ŝuoj kiujn ili estas mem farintaj el ledo, kiun ili estis mem tanintaj, en vestaĵoj, kiujn tuŝis nenia mano ol iliaj propraj, kies materialon ili estis mem tondintaj ĉe la ŝafoj aŭ por kiu ili estis mem kulturintaj linon. En la pretigadon de la vestaĵoj eniris apenaŭ ia aĉetita artiklo, kun escepto de aleno, pinglo, fingringo kaj tre malmultaj partoj de la feraĵo uzata ĉe teksado. La farbojn estis mem akiritaj de la virinoj el arboj, arbustoj kaj herboj ktp.” (Dugald Steward, „Works”, eld. Hamilton, vol. VIII, p. 327-328)

346 En la fama „*Livre des métiers* [Libro de la metioj]” de Etienne Boileau estas interalie preskribite ke submastro ĉe sia akcepto inter la majstroj devas ĵuri „fratece ami siajn fratojn, subteni ilin, ĉiu en sia metio, ne libervole perfidi la sekretojn de la metio kaj en la intereso de la tutaĵo ne atentigi la aĉetanton pri mankoj de la faritaĵo de aliaj por rekomendi sian propran varon”.

kiel la meĥaniko ne lasis sin trompi de la plej granda komplekseco de la maŝinaro pri la konstanta ripetiĝo de la simplaj meĥanikaj potencoj. La moderna industrio konsideras kaj traktas la ekzistantan formon de produktadprocezo neniam kiel definitivan. Ĝia teĥnika bazo estas do revolucia, dum tiu de ĉiuj antaŭaj produktadmanieroj estis esence konservativa.[347] Per maŝinaro, ĥemiaj procezoj kaj aliaj metodoj ĝi konstante revolucias kun la teĥnika bazo de la produktado la funkciojn de la laboristoj kaj la sociajn kombiniĝojn de la laborprocezo. Ĝi revolucias per tio same konstante la labordividon ene de la socio kaj senĉese ĵetas amasojn da kapitalo kaj amasojn da laboristoj el unu produktadbranĉo en la alian. Pro tio, la naturo de la granda industrio bezonas ŝanĝon de la laboro, fluon de la produktado, ĉiuflankan moviĝkapablon de la laboristo. Aliflanke ĝi reproduktas en sia kapitalisma formo la malnovan labordividon kun ties rigidaj apartecoj. Ni vidis, kiel tiu absoluta kontraŭdiro forigas ĉian trankvilon, firmecon, sekurecon de la vivo-situacio de la laboristo, konstante minacas, per forpreno de lia laborrimedo, forpreni lian vivrimedon[348] kaj per superfluigo de lia parta funkcio superfluigi lin mem; ni vidis ankaŭ, kiel tiu kontraŭdiro furiozas per seninterrompaj viktimigoj de la laborista klaso, per plej senmezura malŝparo de laborfortoj kaj per la detruadoj kaŭzataj de la socia anarĥio. Jen la negativa flanko.

Sed se la ŝanĝiĝo de la laboro trudas sin nun ankoraŭ nur kiel potenca naturleĝo kaj per la blinde detrua efiko de naturleĝo, kiu trafas ĉie sur malhelpoj,[349] la granda industrio per siaj katastrofoj trudas la neceson agnoski la ŝanĝon de la laboroj kaj do kiom eble plej grandan disvolvadon

347 „La burĝaro ne povas ekzisti sen revoluciigi seninterrompe la produktado-instrumentojn, do sekve la produktado-rialtojn, do ĉiujn sociajn rilatojn. Sed, kontraŭe al tio, neŝanĝita konservado de la malnovaj produktado-manieroj estis la plej grava ekzistokondiĉo de ĉiuj antaŭaj industriaj klasoj. La konstanta revoluciigo de la produktado, la seninterrompa skuado de ĉiuj sociaj statoj, la eternaj necerteco kaj moviĝo distingas la epokon de la burĝaro disde ĉiuj aliaj antaŭaj. Ĉiuj fikse enrustiĝintaj rilatoj kun sia postsekvo de malnove honorindaj imagoj kaj vidpunktoj estas dissolvataj, ĉiuj nove formiĝintaj malnoviĝas antaŭ ol ili povas rigidiĝi. Ĉio solida kaj daŭra forvaporiĝas, ĉio sankta estas profanata, kaj la homoj finfine estas devigataj rigardi per sobraj okuloj sian vivpozicion, siajn reciprokajn rilatojn.” (Frederiko Engelso kaj Karlo Markso: Manifesto de la Komunista Partio, en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer 1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo, komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, p. 47.

348 „Vi prenas mian vivon, Se vi prenas la rimedojn, per kiuj mi vivas.” (Ŝekspiro)

de la diversaj kapabloj de la laboristoj kiel ĝeneralan socian produktadleĝon kaj adapti la kondiĉojn al ĝia ĝenerala realigo. Jen demando de vivo aŭ morto. La granda industrio devigas la socion, je puno de morto, anstataŭigi la monstraĵon de mizera kaj disponebla laborista loĝantaro, kiun la kapitalo tenas en rezervo por sia ŝanĝiĝanta ekspluatbezono, per la absoluta disponeblo de la homo por ŝanĝiĝantaj laborbezonoj; anstataŭigi la partan individuon, kiu estas nur portanto de socia detala funkcio, per la plene disvolvita individuo, por kiu diversaj sociaj funkcioj estas manieroj okupiĝi kiuj sekvas unu la alian.

Elemento de tiu transforma procezo, disvolvita surbaze de la granda industrio, estas la politeĥnikaj kaj agronomiaj lernejoj, alia estas la profesiaj lernejoj („*écoles d'enseignement professionnel*”), en kiuj la infanoj de la laboristoj ricevas ian instruadon pri teĥnologio kaj pri praktika manipulado de la diversaj produktadinstrumentoj. Kvankam la fabrikleĝaro kiel unuan koncedon pene atingis de la kapitalo la ligadon de baza instruo kun fabriklaboro, ne estas dubo ke la neevitebla konkero de la politika potenco fare de la laborista klaso konkeros ankaŭ la spacon por instruado de teĥnologio, teoria kaj praktika, en la laboristaj lernejoj. Ankaŭ ne estas dubo ke la kapitalisma formo de produktado kaj la respondaj ekonomiaj kondiĉoj de la laboristoj estas en plej rekta kontraŭdiro kun tiaj revoluciaj fermentoj kaj ties celo, la forigo de la malnova labordivido. La evoluo de la kontraŭdiroj de historia produktadformo estas tamen la sola historia vojo de ilia dissolvado kaj novformado. „Restu tajloro ĉe via laboro”[350], tiu kulmino de metia saĝo, fariĝis stultaĵo ekde la momento en kiu la horloĝisto Watt estis inventinta la vapormaŝinon, la frizisto Arkwright la kontinuan teksilon, kaj la oraĵisto Fulton la vaporŝipon.[351]

349 Franca laboristo skribas revene de San-Francisko: „Mi estus neniam kredinta, ke mi kapablas praktiki ĉiujn metiojn kiujn mi praktikis en Kalifornio. Mi estis konvinkita ke ekster presado mi taŭgas por nenio … En tiu mondo de aventuristoj, kiuj ŝanĝas sian profesion pli facile ol la ĉemizon, mi faris, nu jes, kiel la aliaj. Ĉar la laboro en la minejoj ne enspezigis sufiĉe, mi forlasis ĝin kaj iris en la urbon kie mi estis laŭvice presisto, tegmentisto, plumbogisisto ktp. Post tiel sperti ke mi taŭgas al ĉia laboro, mi sentas min malpli kiel molusko kaj pli kiel homo.” (A. Corbon: *„De l'enseignement professionnel”*, 2-a eld., p. 50)

350 Originale: „*ne sutor ultra crepidam*”. -vl

351 John Bellers, vera fenomeno en la historio de la politika ekonomio, komprenis jam fine de la 17-a jarcento kun plena klareco la necesan forigon de la nuna edukado kaj labordividon, kiuj produktas hipertrofion kaj kripliĝon ĉe ambaŭ ekstremaĵoj de la socio, kvankam en kontraŭaj direktoj. Li bele diras

Per la regulado de la laboro en la fabrikoj, manufakturoj ktp, la fabrikleĝaro aperas unue nur kiel enmiksiĝo en la ekspluatrajtojn de la kapitalo. Sed ĉia regulado de la tiel nomata hejmlaboro[352] tuj prezentiĝas kiel rekta enmiksiĝo en la *patria potestas* (patra potenco), t.e. moderne esprimite, en la gepatran aŭtoritaton, paŝo antaŭ kiu la sentema angla parlamento longan tempon ŝajnigis timtremi. Sed la forto de la faktoj fine devigis agnoski ke la granda industrio dissolvas kun la ekonomia bazo de la malnova familia vivo kaj de la kun ĝi kongrua familia laboro ankaŭ la malnovajn familiajn rilatojn mem. La rajto de la infanoj estis proklamenda.[353]

„Malfeliĉe", legeblas en la finraporto de la '*Child. Empl. Comm.*' de 1866, „evidentiĝas el la tutaĵo de la eldiroj de atestantoj, ke la geinfanoj bezonas kontraŭ neniu tiom da protekto kiom kontraŭ siaj gepatroj." La sistemo de senmezura ekspluatado de infanlaboro entute kaj de la hejmlaboro aparte estas

> „konservata nur per tio ke la gepatroj povas, sen ajna brido aŭ kontrolo, praktiki super siaj junaj kaj teneraj idoj tiun arbitran kaj fatalan potencon … Gepatroj devas ne posedi la absolutan potencon fari el siaj infanoj nurajn maŝinojn por eltiri ĉiusemajne tiom kaj tiom da salajro … Infanoj kaj junuloj

---

i.a.: „Nenifare lerni estas ne multe pli bone ol lerni nenifaradon … Korpa laboro estas kion Dio origine aranĝis mem … Laboro estas tiom necesa por la sano de la korpo kiel manĝo por ĝia vivo; ĉar la dolorojn kiujn oni ŝparas al si per nenifarado, oni ricevos per malsano … Laboro metas oleon en la lampon de la vivo, sed pensado fajrigas ĝin … Infanece stulta okupado" (tio antaŭsente al Basedow kaj liaspeculoj kaj ties modernaj fuŝimitantoj) „lasas la spiriton de la infanoj stulta." („*Proposals for raising a Colledge of Industry of all useful Trades and Husbandry*", Londono, 1696, p. 12, 14, 16, 18)

352 Tiu okazas cetere ankaŭ en pli malgrandaj laborejoj, kiel ni vidis [vd p. 192] ĉe la puntmanufakturo kaj pajloplektado, kaj kio speciale montreblus pli detale ankaŭ ĉe la metalmanufakturoj en Ŝefildo, Birminghamo ktp.

353 Do, unue per la anglaj fabrikleĝoj, nuntempe mondskale per la *UN-konvencio pri la rajtoj de la infano*, vd. „Konvencio pri la rajtoj de la infano", en: Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktato pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj, Tekstoj Esperantigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, p. 126-157; pri infanlaboro art. 10, paragrafo 3, p. 84, kiu tamen ne fiksas aĝan limon de infanlaboro, sed nur devigas la ŝtatojn fiksi tian limon. -vl

havas la rajton esti protektataj de la leĝo kontraŭ misuzo de la gepatra potenco kiu antaŭtempe rompas ilian korpan forton kaj tre malaltigas ilin sur la skalo de la moralaj kaj intelektaj estaĵoj."[354]

Tamen ne estas la misuzo de la gepatra potenco kiu kreis la rektan aŭ malrektan ekspluatadon de infanoj fare de la kapitalo, sed inverse estas la kapitalisma ekspluatmaniero kiu faris misuzon de la gepatra potenco per nuligo de ties ekonomia bazo. Kiom ajn terura kaj naŭza la dissolvo de la malnova familio[355] ene de la kapitalisma sistemo aperas, la granda industrio tamen kreas kun la decida rolo kiun ĝi atribuas al la virinoj, gejunuloj kaj geinfanoj en socie organizitaj produktadprocezoj trans la sfero de la hejmo la novan ekonomian bazon de pli alta formo de la familio kaj de la rilato inter la seksoj. Kompreneble estas same absurde konsideri la kristane ĝermanan formon de la familio kiel absolutan kiel la antikvan roman formon aŭ la malnovgrekan aŭ la orientan, kiuj cetere inter si formas progresantan historian serion de evoluo. Same evidentas ke la konsisto de la kombinita laborpersonaro el individuoj de ambaŭ seksoj kaj de plej diversaj aĝoj – kvankam en sia sponte brutala, kapitalisma formo, kie la laboristo ekzistas por la laborprocezo kaj ne la laborprocezo por la laboristo, ĝi estas fonto de korupto kaj sklaveco – en aliaj kondiĉoj devas transformiĝi al fonto de humana evoluo.[356]

La neceso ĝeneraligi al fabrikleĝon el esceptoleĝo por ŝpinejoj kaj teksejoj, tiuj unuaj lokoj de maŝinreĝimo, en leĝon de ĉia socia produktado, fontas, kiel ni vidis, el la historia evoluo de la granda industrio, sur kies fono la tradicia formo de manufakturo, metio kaj hejmlaboro estis komplete revoluciigita, kie la manufakturo transformiĝas konstante en fabrikon, la metio konstante en manufakturon kaj fine la sferoj de la metio kaj de la hejmlaboro en relative mirige mallonga tempo transformiĝas en mizerejojn, kie la plej frenezaj monstraĵoj de la kapitalisma ekspluatado ĝuas sian liberan ludon. Estas du cirkonstancoj kiuj estas fine decidaj, unue la ĉiam denove ripetiĝanta sperto ke la kapitalo, ekde kiam ĝi estas submetita al ŝtata kontrolo nur ĉe kelkaj punktoj de la socia periferio, kompensas sian limigon des pli senmezure ĉe la aliaj punktoj,[357] due la

354 „*Child. Empl. Comm., V. Rep.*", p. XXV, n. 162 kaj II. Rep., p. XXXVIII, n. 285, 289, p. XXV, XXVI, n. 191.

355 Vd Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010.

356 „Fabriklaboro povas esti sama pura kaj bonega kiel hejma laboro, ja eble eĉ pli." („*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1865*", p. 129)

357 Saml., p. 27, 32.

krio de la kapitalistoj mem je egaleco de la konkurenckondiĉoj, t.e. de la samaj baroj de la laborekspluatado.[358] Ni aŭdu pri tio du elkorajn plendojn. La s-roj W. Cooksley (fabrikestroj pri najloj, ĉenoj ktp en Bristolo) libervole enkondukis la fabrikreguladon en sia fabriko.

> „Ĉar la malnova, senregula sistemo daŭras en la najbaraj fabrikoj, ili estas elmetitaj al la miso ke iliaj laborknaboj por aliloka daŭrigo de la laboro post la sesa horo vespere estas forlogitaj (enticed). 'Tio', diras ili kompreneble, 'estas maljustaĵo kontraŭ ni kaj perdo, ke ĝi elĉerpas parton de la forto de la knaboj, kies plenrajta avantaĝo apartenas al ni.'"[359]

S-ro J. Simpson (kartonfabrikestro, Londono) deklaras al la komisaroj de la *Children Empl. Comm.*:

> „Li volas subskribi ĉian peticion por enkonduko de la fabrikleĝo. En la nuna stato de la aferoj, post fermo de sia laborejo li sentas sin ĉiam maltrankvilon dumnokte, ĉe la penso ke aliaj laborigas pli longe kaj forkaptas mendojn antaŭ lia nazo."[360] „Estus maljustaĵo", diras la *Child. Empl. Comm.* resume, „kontraŭ la pli grandaj entreprenistoj submeti iliajn fabrikojn al la regulado, dum en ilia propra aferbranĉo la malgranda industrio estas submetita al nenia leĝa limigo de la labortempo. Al la maljusteco de malsama konkurenckondiĉoj koncerne la laborhorojn kun escepto de malgrandaj laborejoj aldoniĝus ankoraŭ la alia malavantaĝo por la grandaj fabrikestroj ke ilia rekruto de junaj kaj inaj laboristoj estus deturnata al la laborejoj kiujn la leĝo evitas. Fine tio stimulus la pliiĝon de malgrandaj laborejoj, kiuj preskaŭ senescepte estas la malplej favoraj por sano, komforto, edukado kaj ĝenerala plibonigo de la popolo."[361]

En sia finraporto la *Children's Employment Commission* proponas submeti al la fabrikleĝo pli ol 1.400.000 infanojn, junulojn kaj virinojn, el kiuj proksimume la duono estas ekspluatata de etreĝimo kaj de hejmlaboro.[362]

358 Amasajn pruvojn pri tio en la „*Rep. of Insp. of Fact.*"

359 „*Child. Empl. Comm., V. Rep.*", p. X, n. 35.

360 Saml., p. IX, n. 28.

361 Saml., p. XXV, n. 165-167. Kp pri la avantaĝoj de la granda reĝimo kompare kun la etreĝimo *Child. Empl. Comm., III. Rep.*, p. 13, n. 144; p. 25, n. 121; p. 26, n. 125; p. 27, n. 140 ktp.

362 La industribranĉoj submetendaj al la leĝo estas: puntmanufakturo, ŝtrumptrikado, plajloplektado, manufakturo de vestaĵoj kun ĝiaj multnombraj specoj, fabrikado de artefaritaj floroj, ŝufarado, ĉapel- kaj gant-farado, tajlorado, ĉiuj metalfabrikoj de altfornoj ĝis pinglofabrikoj ktp, paperfabrikoj, vitromanufakturo, tabakmanufakturo, gumfabrikoj, fabrikado de varporingoj (por la teksado), mantapiŝ-teksado, manufakturoj de pluv- kaj sun-ombreloj, fabrikado de ŝpiniloj kaj bobenoj, libropresado, librobindado, komerco pri

„Se la parlamento”, diras ĝi, „akceptas nian proponon en ĝia tuta amplekso, tiam estas eksterdube ke tia leĝo faros la plej bonfaran efikon, ne nur por la junuloj kaj malfortuloj, pri kiuj ĝi okupiĝas unue, sed por la ankoraŭ pli granda amaso da plenkreskaj laboristoj, kiuj rekte” (virinoj) „kaj malrekte” (viroj) „venas en ĝian atingopovon. Ĝi trudus al ili regulajn kaj reduktitajn laborhorojn; ĝi mastrumus kaj pliigus la provizon de korpa forto, de kiu tiom dependas ilia propra bonfarto kaj tiu de la lando; ĝi protektus la ĝermantan generacion kontraŭ trostreĉigo en frua aĝo, kiu subfosas ilian konstitucion kaj kondukas al antaŭtempa kadukiĝo; ĝi fine donus, almenaŭ ĝis la 13-a jaro, la okazon de baza instruado kaj per tio ĉesigus la nekredeblan senscion kiu estas tiom fidele priskribita en la raportoj de la komisiono kaj rigardebla nur kun plej turmenta sento kaj la profunda sento de nacia humiliĝo.”[363]

La *Tory*-registaro anoncis en la tronparolado de la 5-a de februaro 1867 ke ĝi formulis la proponojn[364] de la industria enketkomisiono en leĝa formo. Por tio necesis nova dudekjara eksperimento *in corpore vili* [je senvalora korpo]. Jam en la jaro 1840 parlamenta komisiono estis nomumita por enketi pri infanlaboro. Ties raporto de 1842 montris laŭ la vortoj de N. W. Senior

„la plej teruran bildon iam ajn prezentitan de avido, egoismo kaj krueleco de la kapitalistoj kaj gepatroj, de mizero, degradado kaj detruado de la infanoj kaj junuloj … Oni eble supozas ke la raporto priskribas la hororojn de pasinta epoko. Sed bedaŭrinde ni havas raporton kiuj montras ke tiuj hororoj daŭras kun sama intenso kiel antaŭe. Broŝuro aperigita antaŭ du jaroj de Hardwicke deklaras ke la misuzoj kritikitaj en 1842 estas hodiaŭ „en plena floro … Tiu raporto” (de 1842) „kuŝis neatendita dum dudek jaroj, dum kiuj oni permesis al tiuj infanoj, elkreskintaj sen la plej eta ideo pri tio kion ni nomas moralo, nek pri lerneja instruo, religio aŭ natura familia amo – al tiuj infanoj oni

---

skribmaterialoj (al tio apartenas la fabrikado de paperkestoj, kartoj, paperfarboj ktp), ŝnurfarado, manufakturo de gagat-ornamaĵoj, brikejoj, manufakturo de man-silko, *Coventry*-teksado, fabrikoj de salo, de kandeloj, de cemento, sukerfabriko, biskvitfarado, deversaj ligno-laboroj kaj aliaj diversaj laboroj.

363 Saml., p. XXV, n. 169.

364 La leĝo pri etendo de la fabrikleĝoj (*Factory Acts Extension Act*) estis decidita la 12-an de aŭgusto 1867. Ĝi reguligas ĉiujn metal-fandejojn, -forĝejojn kaj -manufakturojn, inkluzive de maŝinfabrikoj, krome vitro-, paper-, guta-perko-, kaŭĉuk-, tabak-manufakturojn, libropresejojn, librobindejojn, fine ĉiujn laborejojn en kiuj estas dungitaj pli ol 50 personoj. – La leĝo pri regulado de la labortempo (*Hours of Labour Regulation Act*), decidita la 17-an de aŭgusto 1867, reguligas la malgrandajn laborejojn kaj la t.n. hejmlaboron. – Mi revenos al tiuj leĝoj, al la nova minejleĝo (*Mining Act*) de 1872 ktp en la II-a volumo.

permesis fariĝi la gepatroj de la nuna generacio.”[365]

Intertempe la socia situacio ŝanĝiĝis. La parlamento ne kuraĝis rifuzi la postulojn de la komisiono de 1863 kiel siatempe tiujn de 1842. Pro tio jam en 1864, kiam la komisiono estis publikiginta nur parton de siaj raportoj, la manufakturoj de ter-varoj (inkluzive de potfarejoj), la fabrikado de tapetoj, de alumetoj, de kartoĉoj kaj de prajmoj same kiel la velurtondado estis metitaj sub la leĝojn validajn por la teksaĵindustrio. En la tronparolado de la 5-a de februaro 1867 la tiama *Tory*-registaro anoncis kromajn leĝojn bazitajn sur la finaj proponoj de la komisiono, kiu intertempe en 1866 estis fininta sian laboron.

La 15-an de aŭgusto 1867 la *Factory Acts Extension Act* – la leĝo por etendo de la fabrikleĝojn – kaj la 21-an de aŭgusto la *Workshops' Regulation Act* – la leĝo por regulado de la laborejoj – ricevis la reĝan konfirmon; la unua leĝo reguligas la grandajn, la dua la malgrandajn branĉojn.

La *Factory Acts Extension Act* reguligas la altfornojn, fer- kaj kuprofabrikojn, la gisejojn, maŝinfabrikojn, metal-laborejojn, fabrikojn por gutaperko, papero, vitro, tabako, krome presejojn kaj librobindejojn kaj entute ĉiujn tiajn industriajn laborejojn en kiuj laboras samtempe kvindek aŭ pli da personoj dum almenaŭ cent tagoj en la jaro.

Por doni ideon pri la amplekso de la kampo entenata en tiu leĝo, ni sekvigas ĉi tie kelkajn en ĝi fiksitajn difinojn:

„*Metio* signifas (en tiu ĉi leĝo): ia ajn manlaboro, praktikata komerce aŭ cele al gajno ĉe, aŭ okaze de, estigo, ŝanĝo, ornamado, riparado aŭ finpretigo por vendo de iu ajn artiklo aŭ de parto da ĝi.”

„*Laborejo* signifas: ia ajn ĉambro aŭ ejo, kovrita aŭ sub libera ĉielo, en kiu ‘metio’ estas praktikata de iu ajn infano, juna laboristo aŭ virino kaj pri kiu tiu, kiu dungis tian infanon, junan laboriston aŭ virinon, havas la rajton je aliro kaj je kontrolo.”

„*Dungita*” signifas: aganta en ‘metio’, ĉu kontraŭ salajro aŭ ne, sub majstro aŭ sub unu el la gepatroj, kiel sube pli detale difinite.”

„*Gepatroj*” signifas: Patro, patrino, kuratoro aŭ alia persono, kiu havas la kuratorecon aŭ kontrolon pri iu ajn … infano aŭ juna laboristo.”

La klaŭzo 7, la punklaŭzo por laborigo de infanoj, junaj laboristoj kaj virinoj kontraŭ la dispozicioj de tiu ĉi leĝo, fiksas monpunojn, ne nur por

365 Senior: „*Social Science Congress*”, p. 55-58.

la posedanto de la laborejo, ĉu unu el la gepatroj aŭ ne, sed ankaŭ por

> „la gepatroj aŭ aliaj personoj, kiuj havas sub sian gardon la infanon, la junan laboriston aŭ la virinon aŭ tiras rektan avantaĝon el ties laboro".

La *Factory Acts Extension Act*, kiu koncernas la grandajn establojn, postrestas kompare kun la fabrikleĝo per amaso da mizeraj esceptoj kaj malkuraĝaj kompromisoj kun la kapitalistoj.

La *Workshops' Regulation Act*, 'leĝo por regulado de la laborejoj', mizera en ĉiaj detaloj, restis morta papero en la mano de la urbaj kaj lokaj instancoj taskitaj pri ĝia plenumado. Kiam la parlamento en 1871 forprenis de ili tiun povon kaj transdonis ĝin al la fabrikinspektistoj, kies kontrolkampon ĝi per tio pligrandigis unufrape per pli ol cent mil laborejoj kaj tricent brikfarejoj, ilia personaro estis plej zorgeme pliigita nur je ok asistentoj, dum ilia personaro estis jam ĝis tiam multe tro malmulta.[366]

Kio okulfrapas en tiu angla leĝdonado de 1867 estas unuflanke la neceso trudita al la parlamento de la regantaj klasoj principe akcepti tiom eksterordinarajn kaj etenditajn disponojn kontraŭ la ekscesoj de la kapitalisma ekspluatado; aliflanke la hezitemo, la malemo kaj la trompemo, per kiu ĝi fine realigis tiujn disponojn.

La enketkomisiono de 1862 proponis ankaŭ novan reguladon de la minejindustrio, industrio kiu distingiĝis disde ĉiuj aliaj per tio ke ĉe ĝi la interesoj de grundposedantoj kaj industriaj kapitalistoj iras man-en-mane. La kontraŭeco de tiuj du interesoj favoris la leĝdonadon de la fabrikleĝoj, la foresto de tiu kontraŭeco sufiĉas por klarigi la prokrastadon kaj la ĉikanojn ĉe la leĝdonado de la minejleĝoj.

La enketkomisiono de 1840 faris tiom hororajn kaj ŝokajn rivelojn kaj kaŭzis tioman skandalon antaŭ la tuta Eŭropo ke la parlamento devis savi sian konsciencon per la minejleĝo (*Mining Act*) de 1842, en kiu ĝi limigis sin malpermesi la subteran laboron de virinoj kaj de infanoj.

Poste venis en 1860 la leĝo pri minej-inspektado (*Mines' Inspection Act)*, laŭ kiu minejoj inspektendas per speciale por tio nomunitaj publikaj oficistoj kaj laŭ kiu knaboj en aĝo inter dek kaj dek du jaroj devas ne esti laborigataj, krom se ili posedas lernejan atestilon aŭ frekventas la lernejon

---

366 La personaro de la fabrikinspektado konsistis el du inspektistoj, du helpinspektistoj kaj 41 subinspektistoj. Ok kromaj subinspektistoj estis nomumitaj en 1871. La ĉiomaj kostoj de la plenumado de la fabrikleĝoj en Anglio, Skotlando kaj Irlando estis en 1871-1872 nur 25.347 sterlingaj pundoj, inkluzive de la tribunalkostoj ĉe procesoj kontraŭ malobeoj.

dum certa nombro da horoj. Tiu leĝo restis tute morta papero pro la ridinde malalta nombro da nomumitaj inspektistoj, pro la eteco de ties rajtoj kaj pro aliaj kaŭzoj kiuj klariĝos poste pli detale.

Unu el la plej novaj blulibroj pri minejoj estas la *Report from the Select Committee on Mines, together with … Evidence, 23 July 1866*. Ĝi estas la verko de komisiono de parlamentanoj (ĉambro de deputitoj), rajtigitaj venigi kaj priaŭskulti atestantojn; dika folianto, en kiu la „raporto" entenas nur kvin liniojn, kun la enhavo ke la komisiono scias nenion diri kaj ke necesas ankoraŭ aŭskulti pliajn atestantojn!

La maniero de la priaŭskultado de la atestantoj memorigas la pridemandadojn (*cross examinations*) antaŭ anglaj tribunaloj, kie la advokato per senhontaj, konfuzigaj plemelaj demandoj provas konfuzi la atestanton kaj tordi al li la vortojn en la buŝo. La advokatoj ĉi tie estas la parlamentaj ekzamenantoj mem, inter ili minejaj posedantoj kaj ekspluatantoj; la atestantoj estas minejlaboristoj, plej ofte en karbminejoj. La tuta farso estas tro karakteriza por la spirito de la kapitalo por ne doni ĉi tie kelkajn eltiraĵojn. Por pli bona superrigardo mi donas ĉi tie la rezultojn de la esplorado ktp en rubrikoj. Mi memorigas ke demando kaj deviga respondo estas en la anglaj blulibroj numeritaj kaj ke la atestantoj, kies eldiroj estas ĉi tie citataj, estas laboristoj en karbminejoj.

*1. Laboro de la knaboj ekde la deka jaraĝo en la minejoj.* La laboro kun necesa irado de kaj al la minejoj daŭras ĝenerale 14 ĝis 15 horojn, esceptokaze pli longe, de la 3-a, 4-a, 5-a matene ĝis la 4-a kaj 5-a vespere. (n. 6, 452, 83) La plenkreskaj laboristoj laboras en du vicoj de po ok horoj; sed por la knaboj ne estas tia alterno, por ŝpari la kostojn. (n. 80, 203, 204) La junaj infanoj ĉefe uzataj por malfermi kaj fermi la ventumajn pordojn en la diversaj partoj de la minejo; la pli maljunaj estas uzataj en pli peza laboro, transportado de karbo ktp. (n. 122, 739, 740) La longaj laborhoroj subtere daŭras ĝis la 18-a aŭ 22-a vivojaro, kiam okazas la transiro al la propradira minejlaboro. (n. 161) Infanoj kaj junuloj estas nuntempe pli malbone traktataj kaj pli peze laborigataj ol en ajna antaŭa periodo. (n. 1663-1667) La minejlaboristoj postulas preskaŭ unuanime parlamentan leĝon por malpermesi minejlaboron ĝis la 14-a vivojaro. Kaj nun Hussey Vivian (mem minekspluatisto) demandas:

> „Ĉu la opinio de la laboristoj ne dependas de la malriĉeco de la laborista familio?" Kaj s-ro Bruce: „Ĉu vi ne pensas ke estus kruele, tie kie la patro mortis aŭ kripliĝis ktp, forpreni tiun resurson de la familio? Devas ja regi ĝenerala regulo. Ĉu vi volas malpermesi en ĉiuj kazoj la laboron sub la tero de

infanoj ĝis la 14-a vivojaroj?” Respondo: „En ĉiuj kazoj.” (n. 107-110)

Vivian: „Se la laboro antaŭ la 14-a jaro estus malpermesata en la minejoj, ĉu la gepatroj tiam ne sendus la infanojn en fabrikojn ktp? – Ĝenerale ne.” (n. 174)

Laboristo: „La malfermado kaj fermado de la pordoj aspektas facila. Ĝi estas tre turmenta afero. Sendepende de la konstanta trablovo, la knabo estas malliberigita, tute same kiel en malluma karcero.” Burĝo Vivian: „Ĉu la knabo ne povas legi dum gardi la pordon, se li havas kandelon? – Unue li devus aĉeti la kandelojn. Sed krome oni ne permesus tion al li. Li estas tie por atenti sian taskon, li devas plenumi sian devon. Mi neniam vidis knabon legi en la minejo.” (n. 139, 141-160)

*2. Edukado.* La minejlaboristoj postulas leĝon por deviga instruado de la infanoj, kiel en la fabrikoj. Ili deklaras la klaŭzon de la leĝo de 1860, laŭ kiuj necesas atesto pri edukado por dungi dek- ĝis dekdu-jarajn knabojn, pure iluzia. Sed jen la priaŭskultado de la kapitalismaj enketjuĝistoj fariĝas vere komika.

„Ĉu la leĝo necesas pli kontraŭ dungistoj aŭ kontraŭ gepatroj? – Kontraŭ ambaŭ.” (n. 116) „Ĉu pli kontraŭ unu ol kontraŭ la alia? – Kiel mi respondu al tio?” (n. 115, 116)

„Ĉu la dungistoj montras ian deziron adapti la laborhorojn al la lerneja instruado? – Ne. La horoj estas niam mallongigitaj por tio.” (n. 137)

Ĉu la minejlaboristoj plibonigas poste sian edukadon? – Ili ĝenerale pli malboniĝas; ili alprenas malbonajn kutimojn; ili dediĉas sin al drinkado kaj ludado kaj simile kaj komplete vrakiĝas.” (n. 211)

„Kial ne sendi la infanojn al vesperaj lernejoj? – En la plej multaj karbodistriktoj ne ekzistas tiaj. Sed la ĉefa afero estas, de la longa kromlaboro ili estas tiom elĉerpitaj ke iliaj okuloj fermiĝas pro laceco.” „Do”, konkludas la burĝo, „vi estas kontraŭ edukado? – Tute ne, sed ktp” (n. 454)

„Ĉu la minejposedantoj ktp ne estas devigataj de la leĝo de 1860 postuli lernejajn atestojn, se ili dungas infanojn inter 10- kaj 12-jaraj? – De la leĝo jes, sed la dungistoj ne faras tion.” (n. 443)

„Ĉu laŭ via opinio tiu leĝa klaŭzo ne estas ĝenerale plenumata? – Ĝi estas tute ne plenumata.” (n. 444)

„Ĉu la minejlaboristoj tre interesiĝas pri la demando de edukado? – La granda plimulto.” (n. 717)

„Kial do ili ne trudas ĝian plenumadon? – Pli ol unu laboristo deziras rifuzi knabojn sen lerneja atesto, sed li fariĝas markita homo (*a market man*).” (n. 720)

„Markita de kiu? – De sia dungisto.” (n. 721)

„Vi ja certe ne kredas ke la dungistoj persekutus viron pro obeo al la leĝo? – Mi kredas ke ili farus tion.” (n. 722)

„Kial la laboristoj ne rifuzas ke tiuj knaboj dungiĝu? – Tio ne estas lasita al ilia elekto.” (n. 723)

„Ĉu vi postulas intervenon de la parlamento? – Se okazu io efika por la edukado de la infanoj de la minejlaboristoj, tiam oni devas fari ĝin deviga pere de parlamenta leĝo.” (n. 1634)

„Ĉu tio devas validi por la infanoj de ĉiuj laboristoj de Britio aŭ nur por minejlaboristoj? – Mi estas ĉi tie por paroli nome de la minejlaboristoj.” (n. 1636)

„Kial distingi minejinfanojn disde aliaj? – Ĉar ili estas escepto el la regulo.” (n. 1638)

„Kiurilate? – En korpa.” (n. 1639)

„Kial edukado estu por ili pli valora ol por knaboj de aliaj klasoj? – Mi ne diras ke ĝi estas pli valora por ili, sed pro ilia trolaboro en la minejoj ili havas malpli da ŝancoj por edukado en tagaj kaj dimanĉaj lernejoj.” (n. 1640)

„Ĉu ne, maleblas absolute pritrakti tiajn demandojn?” (n. 1644) „Ĉu estas sufiĉe da lernejoj en la distriktoj?” – Ne.” (n. 1646)

„Se la ŝtato postulus, ke ĉiu infano sendiĝu al la lernejo, de kie tiam venu la lernejoj por ĉiuj tiuj infanoj? – Mi kredas, ke ekde la cirkonstancoj ordonas tion, la lernejoj estiĝos per si mem.” (n. 1647) „La granda nombro ne nur de la infanoj, sed eĉ de la plenkreskaj minejlaboristoj povas nek skribi nek legi.” (n. 705, 726)

*3. Virinlaboro.* Ekde 1842, laboristinoj estas jam ne uzataj subtere, sed jes ja sur la tero por ŝarĝi karbojn ktp, tiri la kuvojn al la kanaloj kaj al la fervojvagonoj, kribrado de karboj ktp. Ilia uzado tre pliiĝis en la lastaj tri ĝis kvar jaroj. (n. 1727) Plej ofte estas edzinoj, filinoj kaj vidvinoj de minejlaboristoj, de la 12-a ĝis la 50-a kaj 60-a jaro. (n. 647, 1779, 1781)

„Kion la minejlaboristoj pensas pri dungo de virinoj en minejoj? – Ili kondamnas ĝin ĝenerale.” (n. 648)

„Kial? – Ili konsideras ĝin humiliga por la sekso … (n. 649). Ili portas iajn virajn vestaĵojn. En multaj kazoj ĉia honto estas subpremata. Kelkaj virinoj fumas. La laboro estas tiel malpura kiel en la minoj mem. Inter ili estas multaj edzinoj kiuj ne povas plenumi siajn hejmajn devojn.” (n. 651 sj, 701)

„Ĉu la vidvinoj povas trovi tiom enspezigan aferon *(8-10 ŝilingoj semajne)* ie

aliie? – Mi povas nenion diri pri tio.” (n. 709)

„Kaj tamen” *(ŝtona koro)* „vi estas decidita fortranĉi al ili tiun vivrimedon? – Certe.” (n. 710)

„Kio estas la ĝenerala sento en la distrikto … pri dungo de virinoj?” – „La sento estas ke tio degradas ilin; kaj ni kiel ministoj deziras havi pli da respekto al la bela sekso ol vidi ilin en la minejo … Parto de la laboro estas tre peza; kelkaj el tiuj knabinoj levas dek tunojn da materialo tage.” (n. 1715, 1717)

„Ĉu vi kredas ke la laboristinoj dungitaj en la minejoj estas pli senmoralaj ol tiuj dungitaj en la fabrikoj? – La elcentaĵo de la malbonaj estas pli granda ol inter la fabrikknabinoj.” (n. 1732)

„Sed vi ankaŭ ne kontentas pri la stato de la moralo en la fabrikoj? – Ne.” (n. 1733)

„Ĉu vi eble volas malpermesi la virinlaboron ankaŭ en la fabrikoj? – Ne, mi ne volas.” (n. 1734)

„Kial ne? – Ĝi estas por la virina sekso pli honora kaj pli taŭga.” (n. 1735)

„Tamen ĝi estas malutila por ilia moralo, laŭ vi, ĉu?” – Ne, tute ne tiom kiom la laboro ĉe la mino. Mi parolas cetere ne nur pro moralaj, sed ankaŭ pro korpaj kaj sociaj kialoj. La socia degradado de la knabinoj estas plorinda kaj ekstrema. Kiam tiuj knabinoj fariĝas edzinoj de la minejlaboristoj, la viroj profunde suferas tiun degradiĝon, kaj tio forpelas ilin el la domo kaj al drinkaĉo.” (n. 1736)

„Sed ĉu la samo ne validus por la virinoj dungitaj en la ferfabrikoj? – Mi ne povas paroli pri aliaj branĉoj.” (n. 1737)

„Sed kia diferenco estas inter la virinoj dungitaj en ferfabrikoj kaj en minejoj? – Mi ne okupiĝis pri tiu demando.” (n. 1740)

„Ĉu vi povas malkovri diferencon inter unu kaj la alia klaso? – Mi ne certiĝis pri tio, sed konas pro vizito de domo al domo la hontindan staton de la aferoj en nia distrikto.” (n. 1741)

„Ĉu vi ne tre emus aboli virinlaboron ĉie kie ĝi estas degradanta? – Jes … la plej bonaj sentoj de la infanoj devas deveni el edukado fare de la patrino. (n. 1750)

„Sed ĉu tio ne ĝustas ankaŭ por la kampkultura laboro de virinoj? – Tiu daŭras nur du sezonojn, ĉe ni ili laboras tra ĉiuj kvar sezonoj, kelkfoje tage kaj nokte, malsekaj ĝis la haŭto, ilia konstitucio malfortigita, ilia sano rompita.” (n. 1751)

„Ĉu vi ne studis la demandon” *(tiun de virinlaboro)* „ĝenerale? – Mi rigardis ĉirkaŭ mi kaj povas diri tiom ke nenie mi trovis ion paralelan al la virina laboro en la karbminejoj. (n. 1753) Tio estas virlaboro kaj laboro por fortaj

viroj. La pli bona klaso de la minejlaboristoj, kiuj provas leviĝi kaj humaniĝi, anstataŭ trovi apogon ĉe siaj virinoj, ili estas malsupren tirataj de ili.” [n. 1793, 1794, 1808]

Post kiam la burĝoj ankoraŭ plu demandis pelmele, fine montriĝas la sekreto de ilia „kompato” por vidvinoj, malriĉaj familioj ktp:

„La karbo-proprietulo nomumas certajn *gentlemen* por superrigardi, kaj ties politiko estas, por ricevi aprobon, aranĝi ĉion kiom eble plej ekonomie; la dungitaj knabinoj ricevas 1 ŝilingon ĝis 1 ŝ. 6 d. tage, kie viro devus ricevi 2 ŝilingojn 6 d.” (n. 1816)

*4. Mort-enketisto pri la mortoj pro minejaj akcidentoj*

„Koncerne la esplorojn de la mort-enketisto en viaj distriktoj, ĉu la laboristoj kontentas pri la tribunalaj procesoj, kiam akcidentoj okazas? – Ne, ili ne kontentas.” (n. 360)

„Kial ne? – Ĝuste ĉar oni faras homojn ĵurianoj kiuj scias absolute nenion pri minejoj. Oni neniam nomumas laboristojn, krom kiel atestantojn. Ĝenerale oni prenas komercistojn el la najbareco, kiuj estas sub influo de la minej-posedantoj, iliaj klientoj, kaj eĉ ne komprenas la teĥnikajn esprimojn de la atestantoj. Ni postulas ke la minejlaboristoj fariĝu parto de la ĵurio. Mezume la verdikto estas en kontraŭdiro al la eldiroj de la atestantoj.” (n. 361-375)

„Ĉu ĵurioj ne devas esti senpartiaj? – „Jes.” (n. 378)

„Ĉu la laboristoj estus tiaj? – Mi ne vidas motivojn pro kiuj ili ne estu senpartiaj. Ili havas konon de la faktoj.” (n. 379)

„Sed ĉu ili ne havus la tendencon fari en la intereso de la laboristoj maljuste severajn verdiktojn? – Ne, mi ne kredas.” (n. 380)

*5. Falsaj pezilo kaj mezuro*

La laboristoj postulas semajnan anstataŭ dusemajnan pagon, mezuron laŭ pezo anstataŭ laŭ kubikspaco de la kuvoj, protekton kontraŭ la uzado de falsa peso ktp.

„Se la kuvoj estas fraŭde pligrandigitaj, tiam iu povas ja forlasi la minejon post 14-taga sciigo, ĉu? – Sed, kiam li iras al alia loko, li trovas tie la samon.” (n. 1071)

„Sed li povas ja forlasi la lokon tie kie la maljustaĵo estas farata, ĉu? – Ĝi regas ĝenerale.” (n. 1072)

„Sed ĉu la viro povas forlasi sian respektivan lokon post 14-taga sciigo? – Jes.” (n. 1073)

Jen senespera kazo.

*6. Minejinspektado.*

La laboristoj suferas ne nur akcidentojn por eksplodantaj gasoj

„Ni devas plendi same pri la malbona ventumado de la karbminejoj, tiel ke la homoj en ili povas apenaŭ spiri; ili fariĝas per tio nekapablaj je ĉia ajn laboro. Ekz-e ĝuste nun en la parto de la minejo, kie mi laboras, la haladza aero malsanigis multajn homojn por semajnoj. La ĉefaj irejoj estas plej ofte sufiĉe aerumataj, sed ĝuste ne en la lokoj kie la homoj laboras. (n. 234 sj)

„Kial vi ne turnas vin al la inspektisto? – Por diri la veron, multaj timas pri tio; estas kazoj kie homoj perdis sian dungon sekve al sia turniĝo al la inspektisto. Se viro sendas plendon pri aerumado al la inspektisto, li maldungiĝas kaj estas 'markita' viro, kiu ankaŭ aliloke ne trovas dungon. La *Mining inspection Act* de 1860 estas nura paperĉifono. La inspektisto, ilia nombro estas multe tro malgranda, faras eble en sep jaroj unu formalan viziton. Nia inspektisto estas tute nekapabla sepdekjara viro, kiu okupiĝas pri 130 karbminejoj. Krom pli da inspektistoj ni bezonas subinspektistojn."

„Ĉu do la registaro devas teni tian armeon da inspektistoj ke ili povas fari ĉion, kion vi postulas, sen informo de la laboristoj? – Tio maleblas, sed ili devas veni en la minejojn por preni mem la informojn de la laboristoj." (n. 280)

„Ĉu vi ne kredas ke la efiko estus transigi la respondecon *(!)* pri la ventumado ktp de la minejposedantoj al la registaraj oficistoj? – Tute ne; devas esti ilia afero trudi la obeon de la jam ekzistantaj leĝoj." (n. 285)

„Se vi parolas pri subinspektistoj, ĉu vi celas homojn kun malpli da salajro kaj kun malpli alta karaktero ol la nunaj inspektistoj? – Mi tute ne deziras ilin pli malaltaj, se vi povas havi ilin pli bonaj." (n. 294)

„Ĉu vi volas pli da inspektistoj aŭ pli malaltan klason da homoj ol la inspektistoj? – Ni bezonas homojn kiuj cirkulas en la minejoj mem, homojn kiuj ne timas pro sia propra haŭto. (n. 295)

„Se oni plenumus vian deziron je inspektistoj de la pli malbona speco, ĉu ilia manko de lerteco ne kreus danĝerojn ktp? – Ne; estas tasko de la registaro zorgi pri taŭgaj homoj." (n. 297)

Tiu maniero ekzameni fariĝas fine tro sensenca al la prezidanto de la enketkomisiono mem, kiu intervenas:

„Vi volas praktikajn homojn, kiuj rigardu en ĉiujn detalojn de la minejo, iru en ĉiujn truojn kaj angulojn kaj aliru la verajn faktojn … ili raportus al la ĉefinspektisto, kiu poste uzus sian pli altan sciencon." (298, 299)

„Ĉu la ventumado de ĉiuj ĉi malnovaj instalaĵoj ne kaŭzus multajn kostojn? – Jes, kostoj povas estiĝi, sed homvivoj estus protektataj." (n. 531)

Karblaboristo protestas kontraŭ la 17-a sekcio de la leĝo de 1860:

> „Aktuale, kiam la minejinspektisto trovas ian parton de la minejo en ne labortaŭga stato, li devas raporti tion al la minejposedanto kaj al la ministro pri internaj aferoj. Poste la minejposedanto havas dudek tagojn da tempo por pripensi; fine de la dudek tagoj li povas rifuzi ĉian ŝanĝon. Sed se li faras tion, li devas skribi al la ministro pri internaj aferoj kaj proponi al li kvin minej-inĝenierojn, inter kiuj la ministro devas elekti la arbitraciantojn. Ni asertas ke en tiu kazo la minejposedanto nomumas virtuale siajn proprajn juĝistojn.” (n. 581)

La burĝa ekzamenanto, mem minejposedanto:

> „Tiu estas pure spekula objĵeto.” (n. 588) „Ĉu vi do havas tre malaltan opinion pri la honesteco de la minejaj inĝenieroj? – Mi diras, ke tio estas tre malegal-eca kaj eĉ maljusta.” (n. 586)

> „Ĉu minej-inĝenieroj ne posedas ian publikan karakteron, kiu levas iliajn decidojn super la partiecon kiun vi timas? – Mi rifuzas respondi demandojn pri la persona karaktero de tiuj homoj. Mi estas konvinkita ke ili en multaj kazoj agas tre partiece kaj ke tia povo devas ne esti en iliaj manoj, kiam temas pri homvivoj.” (n. 589)

Tiu sama burĝo ne hontas demandi:

> „Ĉu vi ne kredas, ke ankaŭ la minejposedantoj havas perdojn ĉe la eksplod-oj?”

Fine:

> „Ĉu vi laboristoj ne povas zorgi pri viaj interesoj mem, sen alvoki la helpon de la registaro? – Ne.” (n. 1042)

En la jaro 1865 ekzistis 3.217 karbminejoj en Britio kaj – 12 inspekt-istoj. Minejposedanto de Jorkŝiro (*Times*, 26-a de januaro 1867) kalkulas mem, ke sendepende de pure burokrataj aferoj kiuj sorbas ilian tutan tempon, ĉiu minejo viziteblas nur unufoje en dek jaroj. Ne mirige ke la katastrofoj en la lastaj jaroj (speciale ankaŭ 1866 kaj 1867) pliiĝas laŭ nombro kaj amplekso (kelkfoje kun perdo de ducent ĝis tricent homoj). Jen la belecoj de la „libera” kapitalisma produktado!

Ĉiukaze la leĝo de 1872, eĉ kun ĉiuj siaj mankoj, estas la unua, kiu reguligas la laborhorojn de la infanoj laborantaj en minejoj kaj respondec-igas la ekspluatantojn kaj minejposedantojn en certa mezuro pri tiel nomataj akcidentoj.

La reĝa komisiono de 1867 taskita enketi la dungon de infanoj, junuloj

kaj virinoj en la kampkulturo publikigis kelkajn tre gravajn raportojn. Oni faris diversajn provojn apliki la principojn de la fabrikleĝoj, en modifita formo, al la kampkulturo, sed ĝis nun ili ĉiuj totale fiaskis. Sed mi devas ĉi tie atentigi pri la ekzisto de nerezistebla tendenco al aplikado de tiuj principoj.

La ĝeneraligo de la fabrikleĝaro, neevitebla kiel korpa kaj spirita protektilo de la laborista klaso, aliflanke ĝeneraligas kaj rapidigas, kiel jam menciite, la transformadon de disaj kaj nanecaj laborprocezoj en grandskalajn kombinitajn laborprocezojn, do la koncentriĝon de la kapitalo kaj la ekskluzivan reĝimon de la fabriksistemo. Ĝi detruas ĉiajn antikvajn kaj transirajn formojn, malantaŭ kiuj la regado de la kapitalo ankoraŭ parte kaŝiĝas, kaj anstataŭigas ilin per ĝia rekta, senmaska regado. Dum ĝi trudas en la individuaj laborejoj samformecon, regulecon, ordon kaj ekonomion, ĝi pliigas per la grandega sprono, kiun limo kaj regulo de la labortago premas al la teĥniko, la anarĥion kaj la katastrofojn de la kapitalisma produktado ĝenerale, la intenson de la laboro kaj la konkurencon de la maŝinoj kun la laboristo. Per ĝia detruado de la sferoj de eta kaj hejma industrio ĝi neniigas la lastajn rifuĝejojn de la „superfluaj homoj” kaj per tio la ĝisnunan sekurecvalvon de la tuta socia meĥanismo. Per la maturigo de la materiaj kondiĉoj kaj de la socia kombiniĝo de la produktadprocezo ĝi maturigas la kontraŭdirojn kaj antagonismojn de ĝia kapitalisma formo, pro tio samtempe la estigajn elementojn de nova kaj la revoluciajn elementojn de la malnova socio.[367]

367 Roberto Oveno, la patro de la kooperativaj fabrikoj kaj butikoj, kiu tamen, kiel antaŭe menciite, tute ne dividis la iluziojn de siaj imitantoj pri la atingopovo de tiuj izolitaj transformaj elementoj, eliris ne nur fakte en siaj eksperimentoj de la fabriksistemo, sed deklaris tiun ankaŭ teorie la elirpunkto de la socia revolucio. S-ro Vissering, profesoro pri politika ekonomio ĉe la universitato de Lejdo [*Leyden*], ŝajnas antaŭsupozi ion tian, kiam li en sia *Handboek van Praktische Staatshuishoudkunde*, 1860-1862, kiu prezentas ĉiujn kliŝojn de la vulgara ekonomio, pasie apogas metian reĝimon kontraŭ la granda industrio.

*Aldono al la 4-a eldono:* La „nova jura elturniĝo” [vd ĉapitro 8, p. 349], kiun la angla leĝaro kreis per kontraŭdiroj inter la *Factory Acts, Factory Acts Extension Act* kaj *Workshops' Act*, fariĝis fine neeltenebla, kaj tiel estiĝis kodigo de la tuta koncerna leĝaro en la *Factory and Workshop Act* 1878. Kompreneble ĉi tie ne eblas doni detalan kritikon de tiu nun valida industrikodekso de Anglio. Pro tio sufiĉu jenaj notoj: La leĝo entenas

1. teksaĵfabrikojn. Ĉi tie proksimume ĉio restas kiel antaŭe: permesata labortempo por infanoj pli ol dekjaraj: 5 horoj kaj duono tage, aŭ ses horoj kun libera sabato; junuloj kaj virinoj: dek horoj en kvin tagoj, maksimume ses

# 10. Granda industrio kaj kampkulturo

La revolucio, kiun la granda industrio kaŭzas en la kampkulturo kaj en la sociaj kondiĉoj de ties produktantoj, prezenteblas nur poste. Ĉi tie sufiĉas anticipe mallonga indiko de kelkaj rezultoj. Kvankam la uzado de maŝinoj en kampkulturo estas grandparte libera de la korpaj malavantaĝoj kiujn ĝi kaŭzas al la fabriklaboristo[368], ĝi ankoraŭ pli intense „superfluigas" la laboristojn kaj en tio trafas sur malpli da rezistado, kiel ni poste vidos pli detale. Ekz-e en la distriktoj Kambriĝo kaj Sufolko la areo de la kulturata grundo tre etendiĝis en la lastaj dudek jaroj, dum la kampara loĝantaro en la sama periodo ne nur relative, sed absolute malkreskis. En Usono kampkulturaj maŝinoj anstataŭas laboristojn provizore nur virtuale, t.e. ili ebligas al la produktisto kulturi pli grandan

---

horoj kaj duono sabate.

2. Neteksaĵaj fabrikoj. Ĉi tie la dispozicioj estas pli ol antaŭe proksimigitaj al tiuj de n-ro 1, sed daŭre ekzistas kelkaj esceptoj favoraj al la kapitalistoj, kelkfoje eĉ etendeblaj per speciala permeso de la ministro pri internaj aferoj.

3. *Workshops*, difinitaj proksimume kiel en la antaŭa leĝo; koncerne tie dungitaj infanoj, junaj laboristoj aŭ virinoj, la *workshops* estas proksimume egaligitaj al la neteksaĵaj fabrikoj, sed kun pli facilaj kondiĉoj en detaloj.

4. Workshops, en kiuj laboras neniaj infanoj aŭ junuloj, sed nur gelaboristoj pli ol 18-jaraj; por tiu kategorio validas ankoraŭ pli da facilaj kondiĉoj.

5. *Domestic workshops* (hejmlaborejoj), en kiuj laboras nur familianoj en la familia loĝejo; ankoraŭ pli elastaj dispozicioj kaj samtempe la limigo ke la inspektisto sen aparta ministra aŭ juĝista permeso rajtas eniri nur tiajn ĉambrojn kiuj ne estas samtempe uzataj por loĝado, kaj fine la senkondiĉa liberigo de pajloplektado, punt- kaj gant-farado ene de la familio.

Kun ĉiaj siaj mankoj la leĝo estas daŭre, apud la svisa liga fabrikleĝo de la 23-a de marto 1877, kun distanco la plej bona leĝo en tiu kampo. Ĝia komparo kun la menciita svisa liga leĝo estas aparte interesa, ĉar ĝi tre bone montras la avantaĝojn kiel la malavantaĝojn de la du leĝdonaj metodoj – la angla, „historia", intervenanta laŭokaze, kaj la kontinenta, bazita sur la tradicioj de la franca revolucio, pli ĝeneraliga. Bedaŭrinde la angla kodekso, en sia aplikado al la *workshops*, estas daŭre morta papero – pro nesufiĉa personaro de inspektado. – F.E.

368 Detala prezentado de la maŝinoj uzataj en la angla kampkulturo troveblas en „*Die landwirthschaftliche Geräthe und Maschinen Englands* [La kampkulturaj iloj kaj maŝinoj de Anglio]" de d-ro W. Hamm, 2-a eld., 1856. En sia skizo pri la evoluo de la angla kampkulturo s-ro Hamm sekvas senkritike s-ron Leonce de Lavergne. *Aldono al la 4-a eldono:* Nun kompreneble arĥaika. – F. E.

surfacon, sed ne reale forpelas dungitajn laboristojn. En Anglio kaj Kimrio en la jaro 1861 la nombro da personoj partoprenantaj en la fabrikado de kampkulturaj maŝinoj estis 1.034, dum la nombro da kampkulturaj laboristoj laborantaj ĉe vapor- kaj labor-maŝinoj estis nur 1.205.

En la sfero de kampkulturo la granda industrio efikas plej revolucie per tio ke ĝi neniigas la bastionon de la malnova socio, la „terkulturiston”, kaj anstataŭigas lin per la dunglaboristo. Tiel la bezonoj de socia ŝanĝo kaj la klasaj kontraŭdiroj de la kamparo egaliĝas kun tiuj de la urbo. Sur la lokon de la plej kutimpigra kaj malracia reĝimo venas konscia, teĥnologia aplikado de la scienco. La kapitalisma produktadmaniero kompletigas la disŝiradon de la origina familia ligo de kampkulturo kaj manufakturo, kiu ĉirkaŭis la infanece neevoluintan formon de ambaŭ. Sed ĝi kreas samtempe la materiajn premisojn de nova, pli alta sintezo, de la kuniĝo de kampkulturo kaj industrio, surbaze de iliaj kontraŭece ellaboritaj formoj. Kun la ĉiam kreskanta superpezo de la urba loĝantaro, kiu amasiĝas en grandaj centroj, la kapitalisma produktado unuflanke amasigas la historian movforton de la socio, aliflanke ĝi ĝenas la metabolon inter homo kaj tero, do la revenon de grundpartoj eluzitaj de la homo en formo de nutraĵkaj vestad-rimedoj al la grundo, do la eternan naturkondiĉon de daŭra fekundeco de la grundo. Ĝi detruas per tio samtempe la korpan sanon de la urbaj laboristoj kaj la spiritan vivon de la kamplaboristoj.[369] Sed ĝi samtempe devigas, per la detruado de la nur sponte estiĝintaj cirkonstancoj de tiu metabolo, starigi tiun kiel reguligan leĝon de la socia produktado kaj en formo adekvata al la plena homa evoluo. En la kampkulturo kiel en la manufakturo la kapitalisma transformado de la produktadprocezo aperas samtempe kiel martireco de la produktantoj, kaj la laborrimedo kiel rimedo subjugigi, ekspluati kaj malriĉigi la laboriston, la socia kombiniĝo de la laborprocezoj kiel organizita subpremado de ĝia individua vivanteco, libereco kaj memstareco. La diseco de la kamplaboristoj tra grandaj surfacoj samtempe rompas ilian rezistofort-on, dum koncentriĝo altigas tiun de la urbaj laboristoj. Kiel en la urba industrio, en la moderna kampkulturo la kreskanta produktadforto kaj pli granda fluigado de la laboro estas aĉetita per detruado kaj malsanigo de la laborforto mem. Kaj ĉiu progreso de la kapitalisma kampkulturo estas ne nur pro-

369 „Vi dividas la popolon en du malamikajn tendarojn, en krudajn kampulojn kaj dorlotitajn nanojn. Ĉielo! Nacio, fendita en kampkulturaj kaj komercaj interesoj, nomas sin sana, eĉ konsideras sin klera kaj civilizita, ne nur spite al, sed ĝuste pro tiu monstra kaj kontraŭnatura disigo.” (David Urquhart, l.c., p. 119) Tiu tekstero montras samtempe la forton kaj la malforton de speco de kritiko, kiu scias juĝi kaj kondamni la estantecon, sed ne kompreni ĝin.

greso en la arto prirabi la laboriston, sed samtempe en la arto prirabi la grundon, ĉiu progreso en pliigo de la fekundeco por donita tempo estas samtempe progreso en ruinigo de la daŭraj fontoj de tiu fekundeco. Ju pli lando, kiel ekz-e Usono, bazas sian evoluon sur la granda industrio, des pli rapide okazas tiu detruprocezo.[370] Pro tio, la kapitalisma produktado disvolvas la teĥnikon kaj kombinadon de la socia produktadprocezo nur per tio ke ĝi samtempe subfosas la fontojn de ĉia riĉaĵo: la Teron kaj la laboriston.

---

370 Kp Liebig: „*Die Chemie in ihrer Anwendung auf Agrikultur und Physiologie* [La ĥemio en sia aplikado al kampkulturo kaj fiziologio]", 7-a eld., 1862, nome ankaŭ en la unua volumo la „*Einleitung in die Naturgesetze des Feldbaus* [Enkonduko en la naturleĝojn de la kampkulturo]". La prezentado de la negativa flanko de la moderna kampkulturo, el naturscienca vidpunkto, estas unu el la eternaj meritoj de Liebig. Ankaŭ liaj historiaj notoj pri la historio de la kampkulturo, kvankam ne seneraraj, enhavas bonegajn teksterojn. Bedaŭrinde li kuraĝas malsolidajn eldirojn kiel la jenan: „Per plia pulvorigo kaj pli ofta plugado favoriĝas la aerŝanĝo ene de porecaj terpartoj, kaj la surfaco de la terpartoj, al kiuj la aero devas efiki, estas pligrandigata kaj renovigata, sed estas facile kompreneble ke la kromproduktoj de la kampo ne povas esti proporciaj al la laboro aplikata al la kampo, sed ke ili kreskas en multe pli malgranda proporcio." „Tiu leĝo", aldonas Liebig, „estas unue eldirita de J. St. Mill en siaj Princ. of Pol. Econ., vol. I, p. 17, en sekva maniero: 'ke la produkto de la grundo, ĉe cetere senŝanĝaj cirkonstancoj, kreskas en malkreska proporcio kompare kun la kresko de la nombro da dungitaj laboristoj'" (s-ro Mill eĉ ripetas la teoremon de Ricardo en malĝusta formulo: ĉar „*the decrease of the Labourers employes*", la malkresko de la aplikataj laboristoj, en Anglio iris ĉiam sampaŝe kun la progreso en la kampkulturo, la leĝo inventita en Anglio kaj por Anglio, almenaŭ en Anglio ne estas aplikata), „'estas ĝenerala leĝo de la kampkulturo', estas sufiĉe stranga, ĉar ties kaŭzo estis al li ne konata." (Liebig, l.c., vol. I, p. 143 kaj noto)

Sendepende de la erara interpreto de la vorto „laboro", sub kiu Liebig komprenas ion alian ol la politikan ekonomion, estas cetere „sufiĉe strange" ke li faras s-ron J. St. Mill la unua eldirinto de teorio kiun James Anderson en la tempo de A. Smith unue publikigis kaj en diversaj verkoj ripetis ĝis komence de la 19-a jarcento, kiun Malthus – cetere majstro de plagiato (lia tuta teorio de loĝantaro estas senhonta plagiato) – aneksis al si en 1815, kiun West samtempe kaj disvolvis sendepende de Anderson, kiun Ricardo en 1817 metis en kuntekston kun la ĝenerala valorteorio kaj kiu ekde tiam trairis la mondon sub la nomo de Ricardo, kiun en 1820 James Mill (la patro de J. St. Mill) vulgarigis kaj kiun fine interalie ankaŭ s-ro J. St. Mill ripetis kiel dogmon kiu jam fariĝis banalaĵo. Estas nekontesteble ke J. St. Mill dankas sian ĉiukaze

# KVINA SEKCIO – La produktado de absoluta kaj relativa plusvaloro

## *DEKKVARA ĈAPITRO Absoluta kaj relativa plusvaloro*

Ni konsideris la laborprocezon (vidu la kvinan ĉapitron) unue abstrakte, sendepende de ĝiaj historiaj formoj, kiel procezon inter homo kaj naturo. Tie ni diris: „Se oni konsideras la tutan laborprocezon el la vidpunkto de ĝia rezulto, tiam ambaŭ, laborrimedo kaj laborobjekto, aperas kiel produktadrimedoj kaj la laboro mem kiel produktiva laboro.” Kaj en la noto 7 ni kompletigis: „Tiu ĉi difino de produktiva laboro, kia ĝi rezultas el la vidpunkto de la simpla laborprocezo, tute ne sufiĉas por la kapitalisma laborprocezo.” Tion ni devas ĉi tie disvolvi pli detale.

Kiam la laborprocezo estas pure individua, tiam la sama laboristo unuigas en si ĉiujn funkciojn kiuj poste disiĝas. En la individua alproprigo de naturobjektoj por siaj vivbezonoj li kontrolas sin mem. Poste li estos kontrolata. La unuopa homo ne povas efiki sur la naturon sen aktivigo de siaj propraj muskoloj sub kontrolado de sia propra cerbo. Kiel en la natursistemo kapo kaj mano estas kunaj, la laborprocezo unuigas kaplaboron kaj manlaboron. Poste tiuj disigas ĝis al malamika kontraŭeco. La produkto transformiĝas entute el la rekta produkto de la individua produktanto en socian, en la komunan produkton de ĉiomlaboristo, t.e. de kombinita laborpersonaro, kies membroj estas pli aŭ malpli malproksimaj de la manipulado de la laborobjekto. Kun la kunlabora karaktero de la laborprocezo mem do necese etendiĝas la nocio de produktiva laboro kaj de ĝia portanto, la produktiva laboristo. Por labori produktive, jam ne necesas agi per sia propra mano; sufiĉas esti organo de la ĉiomlaboristo, plenumi ian ajn el ties subfunkcioj. La supra origina difino de la produktiva laboro, deduktita el la naturo de la produktado mem, restas ĉiam valida por la ĉiomlaboristo, konsiderata kiel tutaĵo. Sed ĝi jam ne validas por ĉiu el ĝiaj membroj, konsiderata unuope.

Sed aliflanke la nocio de produktiva laboro striktiĝas. La kapitalisma produktado estas ne nur produktado de varo, ĝi estas esence produktado

„strangan” aŭtoritaton preskaŭ ekskluzive al similaj intermiskomprenoj.

de plusvaloro. La laboristo produktas ne por si mem, sed por la kapitalo. Do, jam ne sufiĉas ke li entute produktas. Li devas produkti plusvaloron. Nur tiu laboristo estas produktiva, kiu produktas plusvaloron por la kapitalisto aŭ servas por la memvalorigo de la kapitalo. Por preni ekzemplon ekster la sfero de la materia produktado: instruisto estas produktiva laboristo, se li ne nur okupiĝas pri la kapoj de infanoj, sed klopodas por riĉigi la entrepreniston. Ke tiu investis sian kapitalon en instrufabrikon anstataŭ en kolbasfabrikon, tio neniel ŝanĝas la rilaton. La nocio de produktiva laboristo inkludas do tute ne nur rilaton inter agado kaj uzefiko, inter laboristo kaj laborprodukto, sed ankaŭ specife socian, historie estiĝintan produktadrilaton, kiu stampas la laboriston rekta plivalorigrimedo de la kapitalo. Esti produktiva laboristo do ne estas bonŝanco, sed malbonŝanco. En la kvara libro de tiu ĉi verko, kiu pritraktas la historion de la teorio, oni vidos pli detale, ke la klasika politika ekonomio faris de ĉiam la produktadon de plusvaloro la decida karaktero de la produktiva laboristo. Ilia difino de la produktiva laboristo ŝanĝiĝas do kun ilia koncepto de la naturo de la plusvaloro. Ekzemple la fiziokratoj deklaras, ke nur la kampkultura laboro estas produktiva, ĉar ĝi sole liveras plusvaloron. Sed por la fiziokratoj la plusvaloro ekzistas ekskluzive en la formo de grundrento.

La plilongigo de la labortago trans la punkton, kie la laboristo produktus nur ekvivalenton por la valoro de sia laborforto, kaj la alproprigo de tiu pluslaboro fare de la kapitalo – jen la produktado de la absoluta plusvaloro. Ĝi konsistigas la ĝeneralan bazon de la kapitalisma sistemo kaj la ekirpunkton de la produktado de la relativa plusvaloro. Ĉe tiu la labortago estas dekomence dividita en du partojn: necesa laboro kaj plusvaloro. Por plilongigi la plusvaloron, la necesa laboro estas mallongigata per metodoj per kiuj la ekvivalento de la salajro estas produktata en malpli longa tempo. La produktado de la absoluta plusvaloro koncernas nur la longecon de la labortago; la produktado de la relativa plusvaloro tute revolucigas la teĥnikajn procezojn de la laboro kaj la sociajn grupiĝojn.

Ĝi premisas do specife kapitalisman produktadmanieron, kiu sponte estiĝas kaj elformiĝas kun siaj metodoj, rimedoj kaj kondiĉoj mem nur surbaze de la formala subigo de la laboro sub la kapitalon. Sur la lokon de la formala venas la reala subigo de la laboro sub la kapitalon.

Sufiĉas simple indiki la interajn formojn, en kiuj la pluslaboro ne estas per rekta devigo elpumpata el la produktanto, nek okazis jam ties formala subigo sub la kapitalon. Tie la kapitalo ankoraŭ ne rekte alproprigis al si

la laborprocezon. Apud la memstarajn produktistojn, kiuj metie aŭ kampkulture agas en tradicia, prapatra produktadmaniero, venas la uzuristo aŭ komercisto, la uzurkapitalo aŭ la komerca kapitalo, kiu elsuĉas ilin parazite. Dominado de tiu ekspluatformo en socio ekskludas la kapitalisman produktadmanieron, al kiu ĝi aliflanke, kiel en la malfrua mezepoko, povas esti la transiro. Fine, kiel la ekzemplo de la moderna hejmlaboro montras, certaj interaj formoj estas ie kaj tie reproduktataj sur la fono de la granda industrio, kvankam kun tute ŝanĝita fizionomio.

Dum por la produktado de la absoluta plusvaloro sufiĉas la nur formala subigo de la laboro sub la kapitalon, ekz-e ke metiistoj, kiuj antaŭe laboris por si mem aŭ kiel submajstroj de gilda majstro, nun iras kiel dunglaboristoj sub la rektan kontrolon de la kapitalisto, montriĝas aliflanke, ke la metodoj por produktado de la relativa plusvaloro estas samtempe metodoj por produktado de la absoluta plusvaloro. La senmezura longigo de la labortago prezentiĝis eĉ kiel la plej propra produkto de la granda industrio. Ĝenerale la specife kapitalisma produktadmaniero ĉesas esti nur rimedo por produkti la relativan plusvaloron ekde kiam ĝi akaparis tutan produktadbranĉon, kaj eĉ pli, ekde kiam ĝi gajnis ĉiujn decidajn branĉojn. Ekde tiam ĝi fariĝas ĝenerala, socie reganta formo de la produktadprocezo. Kiel aparta metodo por produktado de la relativa plusvaloro ĝi efikas jam nur, unue kiam ĝi akaparas industriojn kiuj ĝis tiam estis nur formale subigitaj al la kapitalo, kaj due, kiam industrioj, kiujn ĝi jam plene regas, estas konstante revoluciigataj per ŝanĝado de la produktadmetodoj.

El certa vidpunkto la diferenco inter absoluta kaj relativa plusvaloro ŝajnas entute iluzia. La relativa plusvaloro estas absoluta, ĉar ĝi premisas absolutan longigon de la labortago trans la labortempo necesa por la ekzistado de la laboristo. La absoluta plusvaloro estas relativa, ĉar ĝi premisas disvolvadon de la laborproduktivo, kiu ebligas limigi la necesan labortempon al parto de la labortago. Sed se oni konsideras la moviĝon de la plusvaloro, tiam tiu ŝajno de sameco malaperas. Ekde kiam la kapitalisma produktadmaniero establiĝis kaj fariĝis ĝenerala produktadmaniero, la diferenco inter absoluta kaj relativa plusvaloro fariĝas sentebla, ekde kiam temas pri pliigo de la kvoto de la plusvaloro entute. Ni supozu ke la laborforto estas pagata laŭ sia valoro, tiam ni staras antaŭ jena alternativo: Kun donitaj produktadforto de la laboro kaj ĝia normala grado de intenso, la kvoto de la plusvaloro pliiĝas per absoluta plilongigo de la labortago; aliflanke, kun donita limo de la labortago, la kvoto de la plusvaloro altiĝas nur per relativa ŝanĝo de la grandoj de ĝiaj partoj, de la necesa laboro kaj de la plusvaloro, kio siavice, se la salajro ne devas fali sub la

valoron de la laborforto, necesigas ŝanĝon de la produktivo aŭ de la intenso de la laboro.

Se la laboristo bezonas sian tutan tempon por produkti la vivrimedojn necesajn por konservi sin mem kaj sian rason, tiam li ne havas tempon por labori senpage por triaj personoj. Sen certa grado de produktivo de la laboro ne eblas disponebla tempo por la laboristo, sen tia kroma tempo ne eblas pluslaboro nek kapitalistoj, sed ankaŭ ne sklavistoj, nek feŭdaj sinjoroj, unuvorte: nenia klaso de grandaj proprietuloj.[1]

Tiel eblas paroli pri natura bazo de la plusvaloro, sed nur en la tute ĝenerala senco ke nenia absoluta naturobstaklo malebligas al iu ŝpari al si la laboron necesan por sia propra ekzistado kaj trudi ĝin al iu alia, same kiel ekz-e neniaj absolutaj naturobstakloj malhelpas iun uzi la karnon de la alia kiel nutraĵon.[2] Sed oni ne ligu kun tiu natureca laboro, kiel oni ie kaj tie faris, mistikajn ideojn. Nur ekde kiam la homoj estas ellaborintaj sin el siaj unuaj animalecaj statoj, do kiam ilia laboro mem estas jam certagrade sociigita, aperas kondiĉoj, en kiuj la pluslaboro de iu fariĝas la ekzistadkondiĉo de la alia. En la komencoj de la kulturo la akiritaj produktadfortoj de la laboro estas malgrandaj, sed tiaj estas la bezonoj, kiuj evoluas kun kaj per la rimedoj de ilia kontentigo. Krome, dum tiuj komencoj la proporcio de la sociaj partoj, kiuj vivas per fremda laboro, estas ege malgranda kompare kun la amaso de la rektaj produktantoj. Kun la progreso de la socia produktadforto de la laboro tiu proporcio kreskas absolute kaj relative.[3] La kapitalrilato fontas cetere sur ekonomia grundo kiu estas la produkto de longa evoluprocezo. La ekzistanta produktadforto de la laboro, kiu estas la bazo de ĝia estiĝo, ne estas doto de la naturo, sed de historio kiu ampleksas milojn da jarcentoj.

Aparte de pli aŭ malpli evoluinta formo de la socio produktado, la produktadforto de la laboro restas ligita al naturkondiĉoj. Tiuj estas ĉiuj atribueblaj al la naturo de la homo mem, kiel raso ktp, kaj al la naturo lin

1 „La nura ekzisto de majstroj fariĝintaj kapitalistoj kiel aparta klaso dependas de la produktivo de la laboro.” (Ramsay, l.c., p. 206) „Se la laboro de ĉiu viro sufiĉus nur por produkti lian propran nutraĵon, tiam proprieto ne povus ekzisti.” (Ravenstone, l.c., p. 14)

2 Laŭ ĵus farita kalkulo, sole en la jam esploritaj partoj de la Tero vivas ankoraŭ minimume kvar milionoj da kanibaloj.

3 „Ĉe la sovaĝaj indianoj en Ameriko preskaŭ ĉio apartenas al la laboristo. 99 partoj el cent estas atribueblaj al la konto de la laboro. En Anglio la laboristo havas eble eĉ ne du trionojn.” („*The Advantages of the East India* ktp”, p. 72, 73)

ĉirkaŭanta. La eksteraj naturkondiĉoj dividiĝas en du grandaj klasoj: naturan riĉecon je vivrimedoj, do fekundeco de grundo, fiŝriĉeco de akvo ktp, kaj natura riĉaĵo je laborrimedoj, kiel viglaj akvofaloj, ŝipireblaj riveroj, ligno, metaloj, karbo ktp. En la komencoj de la kulturo la unua, sur pli alta evoluŝtupo la dua speco de la natura riĉaĵo estas decida. Oni komparu ekz-e Anglion kun Hindio aŭ, en la antikva mondo, Atenon kaj Korinton kun la bordaj landoj de la Nigra Maro.

Ju malpli grandas la nombro de la absolute konntentigendaj naturbezonoj kaj ju pli grandas la natura fekudeco de la grundo kaj la favoro de la klimato, des malpli grandas la labortempo necesa por konservado kaj reproduktado de la produktanto. Des pli granda povas do esti la kromaĵo de lia laboro por aliuloj super lia laboro por si mem. Ekzemple jam Diodoro rimarkigas pri la antikvaj egiptoj:

> „Estas ja nekredeble, kiom malmulte da peno kaj kostoj la edukado de iliaj infanoj kaŭzas al ili. Ili kuiras al ili la unue renkontatan simplan manĝaĵon; ili manĝigas al ili ankaŭ la malsupran parton de la paperplanto, kiun oni povas rosti en fajro, kaj la radikojn kaj tigojn de la marĉkreskaĵoj, parte krudajn, parte boligitajn kaj frititajn. La plej multaj infanoj iras sen ŝuoj kaj nevestite, ĉar la aero estas tiom milda. Pro tio, infano kostas al siaj gepatroj, ĝis kiam ĝi estas plenkreska, entute ne pli ol dudek draĥmojn. Ĉefe per tio klarigeblas, ke en Egiptio la loĝantaro estas tiom multnombra kaj ke pro tio eblis fari multajn grandajn verkojn.”[4]

Tamen la grandaj konstruaĵoj de la antikva Egiptio eblis malpli pro la amplekso de ĝia loĝantaro ol pro la granda proporcio en kiu tiu estis disponebla. Kiel la individua laboristo povas liveri des pli da pluslaboro, ju malpli grandas lia necesa labortempo, tiel, ju malpli grandas la parto de la laborista loĝantaro necesa por produkti la necesajn vivrimedojn, des pli grandas ĝia parto disponebla por alia faro.

Ekde kiam la kapitalisma produktado regas, sub alie samaj cirkonstancoj kaj ĉe donita daŭro de la labortago, la grando de la pluslaboro varias kun la naturkondiĉoj de la laboro, speciale ankaŭ de la grundfekundeco. Sed el tio tute ne sekvas inverse, ke la plej fekunda grundo estas plej favora por la evoluo de la kapitalisma produktadmaniero, kiu premisas la regadon de la homo super la naturo. Tro abunda naturo „tenas lin ĉe la mano kvazaŭ infanon”. Ĝi ne faras lian propran evoluon naturneceso.[5] La

4 Diodor, l.c., 1, I, ĉ. 80.

5 „Ĉar la unua”(la natura riĉaĵo) „estas plej nobla kaj avantaĝa, ĝi faras la popolon senzorga, fiera kaj sindonema al ĉiaj ekscesoj; la dua, male, devigas al zorgemo, lernemo, lerteco kaj civilizacio.” („*England’s Treasure by*

patrujo de la kapitalo ne troviĝas sub tropika klimato, meze de abunda vegetaĵo, sed en la modera zono. Ne estas la absoluta fekundeco de la grundo, sed ĝia malsameco, la diverseco de ĝiaj naturaj produktoj, kiu estas la natura bazo de la socia labordivido kaj per la ŝanĝiĝo de la naturaj cirkonstancoj, ene de kiuj la homo vivas, spronas lin diversigi siajn proprajn bezonojn, kapablojn, laborrimedojn kaj labormanierojn. La neceso socie regi naturforton, mastrumi ĝin, unue alproprigi ĝin al si aŭ bridi grandskale per homfaritaj rimedoj ludas la plej decidan rolon en la historio de la industrio. Ekzemple la akvoreguligado en Egiptio[6], Lombardujo, Nederlando ktp. Aŭ en Hindio, Persio ktp, kie la akvumado per artefaritaj kanaloj alkondukas ne nur la nemalhaveblan akvon al la grundo, sed samtempe la mineralan sterkaĵon el la montoj. La sekreto de la industria prospero de Hispanio kaj Sicilio sub la araba regado estis la kanalizado.[7]

La favoro de la naturkondiĉoj liveras ĉiam nur la eblecon, neniam la realiĝon de pluslaboro, do de la plusvaloro aŭ de la plusprodukto. La diversaj naturkondiĉoj de la laboro kaŭzas, ke la sama kvanto de laboro en diversaj landoj kontentigas diversajn kvantojn de bezonoj,[8] ke do, sub

*Foreign Trade. Or the Balance of our Foreign Trade is the Rule of our Treasure. Written by Thomas Mun, of London, Merchant, and now published for the common good by his sin son John Mun"*, Londono, 1669, p. 181, 182) „Krome mi povas imagi por tuta popolo nenian pli grandan malfeliĉon ol esti metita sur lokon, kie la produktado de vivtenaj kaj nutraj rimedoj okazas grandparte per si mem kaj kie la klimato postulas aŭ allasas malmultan klopodon por vestado kaj loĝado … tamen eblas ekstremo ankaŭ aliflanka. Grundo, kiu malgraŭ laboro ne povas liveri produktojn, estas same malbona kiel grundo kiu abundas je produktoj sen laboro." (N. Forster:] *„An Inquiry into the Present High Price of Provisions"*, Londono, 1767, p. 10)

6 La neceso kalkuli la periodojn de la nilmoviĝoj kreis la egiptan astronomion kaj kun ĝi la regadon de la pastra kasto kiel gvidanto de la kampkulturo. „La solstico estas la momento en la jaro kiam la altiĝo de Nilo komenciĝas kaj kiun la egiptoj devis do observi kun plej granda atento … Tiun ekvinoksan sezonon ili devis determini por organizi siajn kampkulturajn operaciojn laŭ ĝi. Ili devis do serĉi en la ĉielo videblan signon de ĝia reveno." (Cuvier: „Discours sur les révolutions du globe", éd. Hoefer, Parizo, 1863, p. 141)

7 Unu el la materiaj bazoj de la centra ŝtatpotenco en Hindio super la etaj produktad-organismoj, sen kontakto inter si, estis la regulado de la akvoprovizado. La islamaj regantoj de Hindio komprenis tion pli bone ol iliaj anglaj posteuloj. Ni memoru nur la malsatmizeron de 1866, kiu kostis la vivon de pli ol milionoj da hindoj en la distrikto de Oriso, en Bengalujo.

8 „Ne ekzistas du landoj kiuj liveras saman kvanton da necesaj nutraĵoj en sama

alie analogaj cirkonstancoj, la necesa labortempo estas malsama. Ili efikas sur la pluslaboro nur kiel natura limigilo, do per la determinado de la punkto, ekde kiu la laboro por aliuloj povas komenciĝi. En la sama mezuro, laŭ kiu la industrio evoluas, tiu natura baro cedas. Meze de la okcidenteŭropa socio, kie la laboristo aĉetas la permeson labori por sia propra ekzistado nur per pluslaboro, oni facile imagas, ke liverado de plusprodukto estas eco ennaskita en la homa laboro.[9] Sed oni komparu ekz-e la loĝanton de la orientaj insuloj de la azia insularo, kie la saguo kreskas sur sovaĝaj plantoj en la arbaroj.

> „Kiam la loĝantoj, borante truon en la arbon, kinvinkiĝis ke la medolo estas matura, ili faligas la trunkon kaj dividas ĝin en plurajn pecojn, la medolo estas elskrapata, miksata kun akvo kaj filtrata, kaj post tio ĝi estas tute uzpreta sagu-faruno. Unu arbo donas ĝenerale 300 funtojn kaj povas doni 500 ĝis 600 funtojn. Tie oni iras do en la arbaron kaj eltranĉas sian panon, kiel ĉe ni oni hakas sian brullignon."[10]

Ni supozu ke tia orientazia pantranĉisto bezonas 12 laborhorojn semajne por kontentigi ĉiujn siajn bezonojn. Tio, kion la naturo donas rekte al li, estas multe da libertempo. Por ke li uzu tiun produktive por si mem, necesas tuta serio da historiaj cirkonstancoj; por ke li elspezu ĝin en pluslaboro por fremduloj, necesas ekstera perforta devigo. Se sur lia insulo enkondukiĝus kapitalisma produktado, tiam nia bravulo devus labori eble ses tagojn semajne, por alproprigi al si mem la produkton de unu labortago. La favoro de la naturo ne klarigas, kial li nun laboras dum

---

amplekso kaj kun sama elspezo de laboro. La bezonoj de la homoj kreskas aŭ malkreskas kun la severo aŭ mildeco de la klimato, en kiu ili vivas, kaj sekve la proporcia amplekso de diversaj laboroj, kiujn la loĝantoj de la diversaj landoj estas devigataj fari, ne povas esti sama, kaj la grado de diverseco ankaŭ ne determineblas alie ol laŭ la gradoj de varmo kaj malvarmo. Eblas do ĝenerale konkludi, ke la kvanto da laboro necesa por vivtenado de certa nombro da homoj en malvarmaj klimatoj estas plej granda, en varmaj plej malgranda; en la malvarmaj la homoj bezonas ne nur pli da vestaĵoj, sed la grundo devas ankaŭ esti pli bone prilaborata ol en la varmaj." *(„An Essay on the Governing Causes of the Natural Rate of Interest"*, Londono, 1750, p. 59) La aŭtoro de tiu epokfara anonima skribaĵo estas J. Massie. Hume prenis el ĝi sian interezteorion.

9 „Ĉia laboro devas" (tio ŝajnas ankaŭ aparteni al la rajtoj kaj devoj de la civitano – „droits et devoirs du citoyen" --) „rezultigi kromaĵon." (Prudono) – Vd Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Pri Prudono: La filozofio de la mizero … v.c., p. 104. -vl

10 F. Schow: *„Die Erde, die Pflanze und der Mensch"*, 2-a eld., Lepsiko, 1854, p. 148.

ses tagoj de la semajno aŭ kial li liveras kvin tagojn da pluslaboro. Ĝi klarigas nur, kial lia necesa labortempo estas limigita al unu tago de la semajno. Sed neniakaze lia plusprodukto fontus el ia kaŝita kvalito ennaskita en la homa laboro.

Kiel la historie disvolvitaj, sociaj produktadfortoj, tiel la naturkondiĉitaj ŝajnas esti produktadfortoj de la kapitalo, al kiu ili estas enkorpigitaj.

Ricardo neniam okupiĝas pri la origino de la plusvaloro. Li pritraktas ĝin kiel aferon denaske imanentan de la kapitalisma produktadmaniero, la en liaj okuloj natura formo de la socia produktado. Kie li parolas pri la produktivo de la laboro, li ne serĉas en ĝi la originon de la ekzistado de plusvaloro, sed nur la kaŭzon kiu determinas ĝian grandon. Lia skolo, male, laŭte deklaris la produktivecon de la laboro la estiĝokaŭzo de la profito (komprenu: plusvaloro). Tio estas ĉiukaze progreso kompare kun la merkantilistoj, kiuj siavice klarigas, ke la pli alta prezo de la produktoj super iliaj produktadkostoj devenas el la interŝanĝo, el ilia vendo super ilia valoro. Tamen ankaŭ la skolo de Ricardo nur ĉirkaŭiris la problemon, ne solvis ĝin. Efektive tiuj burĝaj ekonomikistoj sentis instinkte, ke estas tre danĝere tro profunde esplori la demandon pri la deveno de la plusvaloro. Sed kion diri, se duonan jarcenton post Ricardo s-ro John Stuart Mill fiere konstatas sian superecon super la merkantilistoj per malbona ripetado de la ĉirkaŭiroj de la unuaj vulgarigintoj de Ricardo.

Mill diras:

> „La kaŭzo de la profito estas tiu, ke la laboro produktas pli ol necesas por ĝia vivtenado."

Ĝis tie, nenio alia ol la malnova gurdaĵo, sed Mill volas ankaŭ aldoni ion sian:

> „Aŭ, por varii la formon de la teoremo: la kaŭzo, kial la kapitalo liveras profiton, estas tiu, ke nutraĵo, vestaĵoj, krudmaterialoj kaj laborrimedoj daŭras pli longan tempon ol necesan por ilia produktado."

Mill konfuzas ĉi tie la daŭron de la labortempo kun la daŭro de ĝiaj produktoj.Laŭ tiu opinio bakisto, kies produktoj daŭras nur unu tagon, povus neniam tiri el siaj dunglaboristoj la saman profiton kiel maŝinkonstruisto, kies produktoj daŭras dudek jarojn kaj pli. Cetere estas ja vere, ke se la nestoj ne daŭrus pli longe ol la tempon necesan por ilia konstruado, la birdoj devus elturniĝi sen nestoj.

Post konstati tiun bazan veron, Mill konstatas sian superecon super la

merkantilistoj:

> „Ni vidas do, ke la profito estiĝas ne el la incidento de la interŝanĝoj, sed el la produktadforto de la laboro; la ĉiomprofito de lando estas ĉiam determinata per la produktadforto de la laboro, egale ĉu interŝanĝo okazas aŭ ne. Se ne ekzistus divido de la laboroj, tiam ekzistus nek aĉeto nek vendo, sed daŭre profito."

Por li, interŝanĝo, aĉeto kaj vendo – la ĝeneralaj kondiĉoj de la kapitalisma produktado – estas do pura incidento, kaj daŭre ekzistas profito sen aĉeto kaj vendo de la laborforto!

> „Se", daŭrigas li, „ĉiuj laboristoj de lando produktas 20 elcentojn super sia salajrosumo, tiam la profitoj estas 20 elcentoj, kiaj ajn estas la alteco de la varprezoj."

Tio estas, unuflanke, perfekta taŭtologio, ĉar se laboristoj produktas 20-elcentan plusvaloron por siaj kapitalistoj, tiam la profitoj estas en proporcio al la tuta salajro de la laboristoj kiel 20 : 100. Aliflanke estas absolute malĝuste, diri ke la profitoj „estas 20 elcentoj". Ili devas ĉiam esti pli malgrandaj, ĉar profitoj kalkuliĝas laŭ la totala sumo de la antaŭpagita kapitalo. Ni supozu ke la kapitalisto antaŭpagis 500 pundojn, el kiuj 400 pundojn por produktadrimedoj, 100 pundojn por salajro. La kvoto de la plusvaloro estu, kiel supozite, 20 elcentoj, tiam la profitkvoto estus 20 : 500, do 4 elcentoj, kaj ne 20 elcentoj.

Jen Mill donas al ni brilan provaĵon por frandi lian metodon pritrakti la diversajn historiajn formojn de socia produktado:

> „Mi premisas ĉie la nunan staton de la aferoj, kiu regas kun kelkaj esceptoj ĉie, do ke la kapitalisto faras ĉiujn antaŭpagojn, inkluzive de la pago de la laboristo."

Stranga optika trompiĝo, vidi ĉie staton kiu regas ĝis nun nur esceptokaze sur la terglobo! Sed li daŭrigas. Mill ja koncedas ke „ne estas absoluta neceso, ke la afero statas tiel".[11] Male.

---

11 En sia letero al N. F. Danielson de la 28-a de novebmro 1878 Markso proponis jenan version de tiu ĉi paragrafo:

> „Sekvas brila provaĵo por frandi la manieron en kiu Mill pritraktas la diversajn historiajn formojn de la socia produktado: «Mi premisas ĉie», diras li, «la nunan staton de la aferoj, kiu regas kun malmultaj esceptoj ĉie, kie laboristoj kaj kapitalistoj kontraŭstaras unu la alian kiel klasoj, do, ke la kapitalisto faras ĉiujn antaŭpagojn, inkluzive la pagon de la laboristo.» S-ro Mill ja koncedas ke ne estas absoluta neceso, ke estas tiel – eĉ en la ekonomia sistemo, en kiu laboristoj kaj kapitalistoj kontraŭstaras unu la alian kiel klasoj."

> „La laboristo povus, eĉ kun la tuta sumo de sia salajro, atendi la pagon ĝis kiam la laboro estas finfarita, se li por la intertempo havus la necesajn rimedojn por sia vivtenado. Sed en tiu kazo li estus certagrade kapitalisto, kiu metus monon en la aferon, kaj liverus parton de la fonduso necesa por sia daŭrigo."

Kun la sama argumentado Mill povus diri ke la laboristo, kiu antaŭpagas al si mem ne nur la vivrimedojn, sed ankaŭ la laborrimedojn, estas en realo sia propra dunglaboristo. Aŭ ke la usona kampkulturisto estas sia propra sklavo, kiu servutas nur por si mem anstataŭ por sia fremda mastro.

Post kiam Mill klarigis al ni tiom klare, ke la kapitalisma produktado, eĉ se ĝi ne ekzistus, tamen ĉiam ekzistus, li estas nun sufiĉe konsekvenca por pruvi, ke ĝi eĉ tiam ne ekzistas, kiam ĝi ekzistas:

> „Kaj eĉ en la antaŭa kazo" (kiam la kapitalisto antaŭpagas al la dunglaboristo ĉiujn liajn vivrimedojn) „la laboristo rigardeblas el la sama vidpunkto" (do kiel kapitalisto). „Ĉar per tio ke li donas sian laboron sub la merkatprezo (!), li konsidereblas kvazaŭ li antaŭpagus la diferencon (?) al sia entreprenisto ktp."[12]

En la fakta realeco la laboristo antaŭpagas al la kapitalisto sian laboron dum semajno ktp senrekompence, por ricevi fine de la semajno ktp ĝian merkatprezon; laŭ Mill, tio faras lin kapitalisto! En plata ebeno eĉ teramasetoj ŝajnas esti montoj; tiel oni mezuru la platecon de nia nuntempa burĝaro laŭ la kalibro de ĝiaj „grandaj spiritoj".

12 J. St. Mill: „Priciples of Political Economy", Londono, 1868, p. 252-253, divl. – {La supraj teksteroj estas tradukitaj laŭ la franca eldono de la „Kapitalo". – F. E.}

# DEKKVINA ĈAPITRO Ŝanĝiĝo de grando de prezo de la laborforto kaj de la plusvaloro

La valoro de la laborforto estas determinata per la valoro de la kutime necesaj vivirimedoj de la mezuma laboristo. La kvanto de tiuj vivrimedoj, kvankam ilia formo povas ŝanĝiĝi, estas donita en certa epoko de certa socio kaj pro tio trakteblas kiel konstanta grando. Tio, kio ŝanĝiĝas, estas la valoro de tiu kvanto. Du kromaj faktoroj eniras en la valordeterminadon de la laborforto. Unuflanke ĝiaj evolukostoj, kiuj ŝanĝiĝas kun la produktadmaniero, aliflanke la natura diferenco, ĉu ĝi estas vira aŭ ina, plenkreska aŭ neplenkreska. La konsumado de tiuj diversaj laborfortoj, ree kondiĉita de la produktadmaniero, faras grandan diferencon en la reproduktadkostoj de la laborista familio kaj en la valoro de la plenkreska vira laboristo. Ambaŭ faktoroj restas tamen ekskluditaj ĉe la sekva analizo.[13]

Ni supozu ke 1-e la varoj estas vendataj je sia valoro, 2-e ke la prezo de la laborforto ja okaze kreskas super sia valoro, sed neniam falas sub ĝi.

Laŭ tiuj supozoj troviĝis, ke la relativaj grandoj de prezo de la laborforto kaj de la plusvaloro estas kondiĉitaj de tri cirkonstancoj:

1-e la daŭro de la labortago aŭ la malintensa grando de la laboro;

2-e la normala intenso de la laboro aŭ ĝia intensa grando, tiel ke certa laborkvanto estas elspezata en certa tempo;

3-e fine la produktadforto de la laboro, tiel ke laŭ la evolugrado de la produktadkondiĉoj la sama kvanto da laboro liveras en la sama tempo pli grandan kvanton da produkto.

Evidente eblas tre diversaj kombiniĝoj , laŭ tio, ĉu unu el la tri faktoroj estas konstanta kaj du variaj, aŭ du faktoroj konstantaj kaj unu varia, aŭ ĉu fine ĉiuj estas samtempe variaj. Tiuj kombiniĝoj ankoraŭ pli diversiĝas per tio, ke ĉe samtempa variado de diversaj faktoroj la grando kaj la direkto de la variadoj povas esti malsamaj. Jen prezentiĝas nur la ĉefaj kombiniĝoj.

13 La kazo pritraktita [en la deka ĉapitro sur p. 18] estas ĉi tie kompreneble ankaŭ ekskludita. {Noto al la 3-a eld. – F. E.}

## I. Grando de la labortago kaj intenso de la laboro konstantaj (donitaj), produktadforto de la laboro varia

Sub tiu kondiĉo, valoro de la laborforto kaj plusvaloro determiniĝas per tri leĝoj.

**Unue:** La labortago de donita grando prezentiĝas ĉiam en la sama valorprodukto, kiel ankaŭ la produktivo de la laboro kaj kun tiu la produktkvanto kaj pro tio la prezo de la unuopa varo.

La valorprodukto de dekduhora labortago estas ekz-e 6 ŝ., kvankam la kvanto de la produktataj uzvaloroj ŝanĝiĝas kun la produktivo de la laboro, la valoro de 6 ŝ. do dividiĝas por pli aŭ malpli da varoj.

**Due:** La plusvaloro kaj la valoro de la laborforto varias en inversa direkto unu al la alia. La plusvaloro varias en la sama direkto kiel la produktadforto de la laboro, sed la valoro de la laborforto en la mala direkto.

La valorprodukto de la dekduhora labortago estas konstanta grando, ekz-e 6 ŝilingoj. Tiu konstanta grando egalas al la sumo de la plusvaloro plus la valoro de la laborforto, kiun la laboristo anstataŭigas per ekvivalento. Estas evidente, ke el du partoj de konstanta grando neniu povas pliiĝi sen ke la alia malpliiĝas. La valoro de la laborforto ne povas kreski de 3 ŝ. al 4, sen ke la plusvaloro falas de 3 ŝ. al 2, kaj la plusvaloro ne povas kreski de 3 ŝ. al 4 ŝ., sen ke la valoro de la laborforto falas de 3 ŝ. al 2. En tiuj cirkonstancoj do ne eblas ŝanĝo de la absoluta grando, ĉu de la valoro de la laborforto, ĉu tiu de la plusvaloro, sen samtempa ŝanĝo de iliaj relativaj aŭ proporciaj grandoj. Maleblas ke ili falas aŭ kreskas samtempe.

La valoro de la laborforto krome ne povas fali, do la plusvaloro ne kreski, sen ke la produktadforto de la laboro kreskas, ekz-e en la supra kazo la valoro de la laborforto ne povas fali de 3 al 2 ŝilingoj, sen ke la kreskinta produktadforto ebligas produkti en 4 horoj la saman kvanton da vivrimedoj kiuj antaŭe bezonis por sia produktiĝo 6 horojn. Inverse la valoro de la laborforto ne povas kreski de 3 al 4 ŝ., sen ke la produktadforto de la laboro falas, do 8 horoj necesas por produkti la saman kvanton da vivrimedoj por kio antaŭe sufiĉis 6 horoj. El tio sekvas, ke la kresko de la produktadforto de la laboro malaltigas la valoron de la laborforto kaj per tio altigas la plusvaloron, dum inverse la malkresko de la produktadforto kreskigas la valoron de la laborforto kaj malaltigas la plusvaloron.

Ĉe la formulado de tiu leĝo Ricardo pretervidis unu cirkonstancon:

Kvankam la ŝanĝo de la grando de la plusvaloro aŭ de la pluslaboro kondiĉas inversan ŝanĝon de la grando de la valoro de la laborforto aŭ de la necesa laboro, el tio tute ne sekvas, ke ili ŝanĝiĝas en la sama proporcio. Ili kreskas aŭ malkreskas je la sama grando. Sed la proporcio, en kiu ĉiu parto de la valorprodukto aŭ de la labortago kreskas aŭ malkreskas, dependas de la origina divido, kiu okazis antaŭ la ŝanĝo de la produktadforto. Se la valoro de la laborforto estis 4 ŝilingoj aŭ la necesa labortempo 8 horoj, la plusvaloro 2 ŝ. aŭ la pluslaboro 4 horoj kaj se, pro kreskinta produktadforto de la laboro, la valoro de la laborforto falas al 3 ŝ. aŭ la necesa laboro al 6 horoj, tiam la plusvaloro kreskas al 3 ŝ. aŭ la pluslaboro al 6 horoj. Estas la sama grando de 2 horoj aŭ 1 ŝ., kiuj estas tie aldonita, ĉi tie forprenita. Sed la proporcia grandoŝanĝo estas ĉe la du flankoj malsama. Dum la valoro de la laborforto falas de 4 ŝ. al 3, do je $^1/_2$ aŭ 25 elcentoj, la plusvaloro kreskas de 2 ŝ. al 3, do je $^1/_2$ aŭ 50 elcentoj. El tio sekvas, ke la proporcia kresko aŭ malkresko de la plusvaloro, sekve al donita ŝanĝo de la produktadforto de la laboro, estas des pli granda, ju malpli grandas la origina parto de la labortago, kiu prezentiĝas en plusvaloro, kaj inverse.

**Trie:** Kresko aŭ malkresko de la plusvaloro estas ĉiam la sekvo kaj neniam la kaŭzo de respektiva kresko kaj malkresko de la valoro de la laborforto.[14]

Ĉar la labortago estas konstanta grando, prezentiĝas en konstanta valorgrando, al ĉia ŝanĝo en la grando de la plusvaloro respondas inversa ŝanĝo en la grando de la valoro de la laborforto, kaj ĉar la valoro de la laborforto povas ŝanĝi nur kun ŝanĝo de la produktadforto de la laboro, evidente sekvas sub tiuj kondiĉoj, ke la ŝanĝo de la grando de la plusvaloro fontas el inversa ŝanĝo de la grando en la valoro de la laborforto. Do, ĉar ni vidis, ke nenia absoluta ŝanĝo de la valoro de la laborforto kaj de la plusvaloro eblas sen ŝanĝo de iliaj relativaj grandoj, tiam sekvas nun, ke nenia ŝanĝo de iliaj relativaj valorgrandoj eblas sen ŝanĝo de la absoluta

14 Pri tiu teoremo MacCulloch faris la absurdan aldonon, ke la plusvaloro sen falo de la valoro de la laborforto povas kreski per forigo de impostoj, kiujn la kapitalisto devis antaŭe pagi. La forigo de tiaj impostoj ŝanĝas absolute neniom la kvanton de la plusvaloro, kiun la industria kapitalisto kiel la unua elpumpas el la laboristo. Ĝi ŝanĝas nur la proporcion, en kiu li metas la plusvaloron en sian propran poŝon aŭ devas dividi ĝin kun triaj personoj. Ĝi do neniom ŝanĝas la proporcion inter la valoro de la laborforto kaj la plusvaloro. La escepto de MacCulloch pruvas do nur lian miskomprenon de la regulo, eraro kiu okazas en la vulgarigo de Ricardo same ofte kiel al J. B. Say en la vulgarigo de A. Smith.

valorgrando de la laborforto.

Laŭ la tria leĝo la ŝanĝo de grando de la plusvaloro premisas valor-ŝanĝiĝon de la laborforto kaŭzitan de ŝanĝo de la produktadforto de la laboro. La limoj de tiu ŝanĝo estas donitaj per la nova valorlimo de la laborforto. Tamen, eĉ se la cirkonstancoj permesas al la leĝo efiki, povas okazi obstaklaj moviĝoj. Se ekz-e, sekve al kreskinta produktadforto de la laboro, la valoro de la laborforto falas de 4 ŝilingoj al tri aŭ la necesa labortempo de 8 horoj al 6, tiam la prezo de la laborforto povus fali nur al 3 ŝ. 8 d., 3 ŝ. 6 d., 3 ŝ. 2 d. ktp, kaj pro tio la plusvaloro kreski nur al 3 ŝ 4 d., 3 ŝ. 6 d., 3 ŝ. 10 d. ktp. La grado de la falo, kies minimuma limo estas 3 ŝ., dependas de la relativa pezo, kiun la premo de la kapitalo ĉe unu flanko, la rezistado de la laboristoj de la alia flanko ĵetas en la pesiltason.

La valoro de la laborforto estas determinata per la valoro de certa kvanto da vivrimedoj. Tio, kio ŝanĝiĝas kun la produktadforto de la laboro, estas la valoro de tiuj vivrimedoj, ne ilia kvanto. La kvanto mem povas, ĉe kreskanta produktadforto de la laboro, kreski por laboristo kaj kapitalisto samtempe kaj en la sama proporcio, sen ia ajn ŝanĝo en la grando inter prezo de la laborforto kaj plusvaloro. Se la origina valoro de la laborforto estas 3 ŝ. kaj se la necesa labortempo estas 6 horoj, se la plusvaloro estas same 3 ŝ. aŭ la plusvaloro daŭras ankaŭ 6 horojn, tiam duobligo de la produktadforto de la laboro, ĉe senŝanĝa divido de la labortago, lasus la prezon de la laborforto kaj la plusvaloron senŝanĝaj. Sed ĉiu el ili prezentiĝus en duoble da multaj, sed proporcie malpli kostaj uzvaloroj. Kvankam la prezo de la laborforto restus senŝanĝa, ĝi kreskus super sian valoron. Se la prezo de la laborforto falus, sed ne ĝis la minimuma limo de 11/2 ŝ, donita de sia nova valoro, sed al 2 ŝ. 10 d., 2 ŝ. 6 d. ktp, tiam tiu falanta prezo daŭre reprezentus kreskantan kvanton de vivrimedoj. La prezo de la laborforto povus tiel ĉe kreskanta produktad-forto de la laboro konstante fali kun samtempa, konstanta kreskado de la kvanto de vivrimedoj de la laboristo. Sed relative, do kompare kun la plusvaloro, la valoro de la laborforto malkreskus konstante kaj tiel plilarĝiĝus la abismo inter la vivkondiĉoj de laboristo kaj kapitalisto.[15]

La tri leĝoj supre klarigitaj estis unuafoje strikte formulitaj de Ricardo. La mankoj de lia prezentado estas,

15 „Se en la produktadforto de la industrio etendiĝas ŝanĝo, tiel ke per donita kvanto da laboro kaj da kapitalo produktiĝas pli aŭ malpli, la parto de la salajro povas evidente ŝanĝiĝi, dum la kvanto, kiun tiu parto reprezentas, restas la sama, aŭ la kvanto povas ŝanĝiĝi, dum la parto restas senŝanĝa.” ([J. Cazenove,]: „*Outlines of Political Economy* ktp”, p. 67)

1-e ke li konsideras la apartajn kondiĉojn, ene de kiuj tiuj leĝoj validas, kiel la memkompreneblajn, ĝeneralajn kaj ekskluzivajn kondiĉojn de la kapitalisma produktado. Li ne konas ŝanĝon, nek de la daŭro de la labortago nek de la laborintenso, tiel ke ĉe li la produktadforto de la laboro fariĝas per si mem la sola varia faktoro; sed

2-e, kaj tio falsas lian analizon en multe pli alta grado, li same kiel la aliaj ekonomikistoj neniam esploris la plusvaloron kiel tian, do sendepende de ĝiaj apartaj formoj, kiel profito, grundrento ktp. Li do konfuzas la leĝojn de la kvoto de la plusvaloro kun la leĝoj de la profitkvoto. Kiel dirite, la profitkvoto estas la proporcio de la plusvaloro al la antaŭpagita tuta kapitalo, dum la kvoto de la plusvaloro estas la proporcio de la plusvaloro al la nur varia parto de tiu kapitalo. Supozu ke kapitalo de 500 sterlingaj pundoj (K) dividiĝas en krudmaterialoj, labormaterialoj ktp por kune 400 pundoj (k) kaj en 100 pundoj por salajroj (v); ke krome la plusvaloro estas 100 pundoj (p). Tiam la kvoto de la plusvaloro estas p/v = 100 pundoj / 100 pundoj = 100 %. Sed la profitkvoto p/K = 100 pundoj/500 pundoj = 20 %. Krome evidentas, ke la profitkvoto povas dependi de cirkonstancoj, kiuj tute ne efikas sur la kvoton de la plusvaloro. Poste, en la Tria Libro de tiu ĉi verko mi pruvos, ke kun donita kvoto de plusvaloro, la profitkvoto povas senfine varii, kaj ke kun donita profitkvoto ĝi povas respondi al plej diversaj kvotoj de plusvaloro.

## II. Labortago konstanta, produktadforto de la laboro konstanta, laborintenso varia

Kreskanta laborintenso implicas plian elspezon de laboro en la sama tempo. La pli intensa labortago konkretiĝas do en pli da produktoj ol malpli intensa laboro de sama daŭro. Ankaŭ per pli alta produktadforto la sama labortago liveras pli da produktoj, sed en tiu kazo la valoro de la unuopa produkto malkreskas, ĉar ĝi kostas malpli da laboro ol antaŭe. En la kazo de plia laborintenso ĝi restas senŝanĝa, ĉar la produkto kostas nun kiel antaŭe same multan laboron. La nombro de produktoj kreskas tiam sen falo de ĝia prezo. Kun ilia nombro kreskas la prezsumo, dum per pli alta produktadforto la sama valorsumo prezentiĝas nur en pli granda produktkvanto. Ĉe senŝanĝa hornombro la pli intensa labortago konkretiĝas do en pli alta valorprodukto, do, ĉe senŝanĝa monvaloro, en pli da mono. Ĝia valorprodukto varias kun la deflankiĝoj de ĝia intenso disde la socie normala grado. La sama labortago do prezentiĝas ne kiel antaŭe en konstanta, sed en varia valorprodukto, la pli intensa dekduhora labortago

ekz-e en 7 ŝ., 8 ŝ. ktp anstataŭ en 6 ŝ. de la dekduhora labortago kun kutima intenseco. Estas klare: Se la valorprodukto de la labortago varias ekz-e de 6 al 8 ŝ., tiam ambaŭ partoj de tiu valorprodukto, prezo de la laborforto kaj plusvaloro, povas kreski samtempe, ĉu en sama, ĉu en malsama grado. Prezo de la laborforto kaj plusvaloro povas ambaŭ kreski samtempe de 3 ŝ. al 4, se la valorprodukto kreskas de 6 al 8 ŝ. Prezaltiĝo de la laborforto ĉi tie ne nepre inkludas altigon de ĝia prezo super ĝia valoro. Ĝi povas inverse esti akompanata de falo sub ĝia valoro. Tio okazas ĉiam, kiam la prezaltiĝo de la laborforto kompensas ĝian akcelitan foruzadon.

Estas konate, ke kun provizoraj esceptoj ŝanĝo de la laborproduktivo rezultigas ŝanĝon de la valorgrando de la laborforto kaj do la grandon de la plusvaloro nur tiam, kiam la produktoj de la koncernataj industribranĉoj eniras en la kutiman konsumadon de la laboristo. Tiu baro ne ekzistas ĉi tie. Ĉu la grando de la laboro ŝanĝiĝas malintense aŭ intense, al la ŝanĝo de ĝia grando respondas ŝanĝo en la grando de ĝia valorprodukto, sendepende de la naturo de la artiklo, en kiu tiu valoro prezentiĝas.

Se la intenso altiĝus en ĉiuj industribranĉoj samtempe kaj samgrade, tiam la nova pli alta intensogrado fariĝus la kutima socia normalgrado kaj per tio ĉesus esti konsiderebla kiel malintensa grando. Sed eĉ tiam restus la mezumaj intensogradoj de la laboro ĉe diversaj nacioj kaj do modifus la aplikadon de la valorleĝo al diversaj naciaj labortagoj. La pli intensa labortago de iu nacio prezentiĝas en pli alta monesprimo ol la malpli intensa de la alia.[16]

## III. Produktadforto kaj intenso de la laboro konstantaj, labortago varia

La labortago povas varii laŭ du direktoj. Ĝi povas esti mallongigata aŭ longigata.

16 „Sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj la angla fabrikisto povas en donita tempo elpreni konsiderinde pli grandan kvanton da laboro ol eksterlanda fabrikisto, tiom, por kompensi la diferencon de la labortagoj inter 60 horoj ĉi tie kaj 72 ĝis 80 horoj aliloke.” („*Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1855”*, p. 65) Pli granda laŭleĝa mallongigo de la labortago en la kontinentaj fabrikoj estus la senmanka rimedo por malpliigi tiun diferencon inter la kontinenta kaj la angla laborhoro.

1. Mallongigo de la labortagu sub la donitaj kondiĉoj, do senŝanĝaj produktadforto kaj intenso de la laboro, lasas la valoron de la laborforto kaj do la necesan laboron senŝanĝa. Ĝi mallongigas la pluslaboron kaj la plusvaloron. Kun la absoluta grando de la plusvaloro falas ankaŭ ĝia relativa grando, do ĝia grando en proporcio al la senŝanĝa valoro de la laborforto. Nur per malaltigo de ĝia prezo sub ĝian valoron la kapitalisto povus kompensi tion.

Ĉiuj tradiciaj diroj kontraŭ la mallongigo de la labortago premisas, ke la fenomeno okazas sub la ĉi tie premisitaj cirkonstancoj, dum en la realo aŭ antaŭis aŭ tuj sekvas ŝanĝo de la produktadforto kaj de la intenso de la laboro, ĉu per mallongigo de la labortago.[17]

2. Longigo de la labortago: La necesa labortempo estu 6 horoj aŭ la valoro de la laborforto 3 ŝ., same la plusvaloro 6 horoj kaj la plusvaloro 3 ŝ. La tuta labortago estas tiam 12 horoj kaj prezentiĝas en valorprodukto de 6 ŝ. Se la labortago estas longigita per 2 horoj kaj se la prezo de la laborforto restas senŝanĝa, tiam kreskas kun la absoluta la relativa grando de la plusvaloro. Kvankam la valorgrando de la laborforto restas absolute senŝanĝa, ĝi falas relative. Sub la konciĉoj de I. la relativa valorgrando de la laborforto ne povis ŝanĝiĝi sen ŝanĝiĝo de ĝia absoluta grando. Ĉi tie, male, la ŝanĝo de la relativa grando de la valoro de la laborforto estas la rezulto de ŝanĝo de la absoluta grando de la plusvaloro.

Ĉar la valorprodukto, en kiu la labortago prezentiĝas, kreskas kun ties propra longigo, la prezo de la laborforto kaj la plusvaloro povas kreski samtempe, ĉu je sama, ĉu je malsama kresko. Tiu samtempa kresko eblas do en du kazoj: ĉe absoluta longigo de la labortago kaj ĉe kreskanta intenso de la laboro sen tia longigo.

Ĉe longigita labortago la prezo de la laborforto povas fali sub ties valoro, kvankam ĝi nominale restas senŝanĝa aŭ eĉ kreskas. La taga valoro de la laborforto estas taksata, kiel ni memoras, laŭ ĝia normala mezuma daŭro aŭ laŭ la normala vivodaŭro de la laboristo kaj laŭ kun tio kongrua, normala – kaj adaptita al la homa naturo – transformado de vivsubstanco en movon.[18] Ĝis certa punkto, la pli granda foruzado de la laborforto, nedisigebla de la longigo de la labortago, kompenseblas per pli

17 „Ekzistas kompensantaj cirkonstancoj … kiuj montriĝis per la aplikado de la dekhorleĝo." („*Reports of Insp. of Fact. for 31st October 1848*", p. 7)

18 „La laborkvanto, kiun homo en la daŭro de 24 horoj liveris, determineblas proksimume per esplorado de la ĥemiaj ŝanĝoj kiuj okazis en lia korpo, ĉar ŝanĝitaj formoj de la materio indikas la antaŭan streĉiĝon de movforto." (Grove: „*On the Correlation of Physical Forces*", [p. 308, 309])

granda salajra kompensaĵo. Trans tiu punkto la foruzado kreskas en geometria progreso kaj samtempe ĉiuj normalaj reproduktad- kaj agad-kondiĉoj de la laborforto estas detruataj. La prezo de la laborforto kaj ĝia ekspluatgrado ĉesas esti kunmezureblaj grandoj.

## IV. Samtempa variado de daŭro, produktadforto kaj intenso de la laboro

Ĉi tie evidente eblas granda nombro da kombiniĝoj. Po du faktoroj povas varii kaj unu resti senŝanĝa, aŭ ĉiuj tri povas varii samtempe. Ili povas varii en sama aŭ malsama grado, en la sama aŭ en la kontraŭa direkto, iliaj variaĵoj povas do parte aŭ tute per kompenso nuliĝi. Tamen la analizo de ĉiuj eblaj kazoj facilas laŭ la klarigoj donitaj sub I, II kaj III. Oni trovas la rezulton de ĉiu ebla kombiniĝo traktante laŭvice po unu faktoron kiel varian kaj la aliajn unue kiel konstantajn. Ni mallonge notas ĉi tie do nur du gravajn kazojn.

1. Malkreskanta produktadforto de la laboro kun samtempa longigo de la labortago:

Ni parolas ĉi tie pri malkreskanta produktadforto de la laboro, ĉar temas pri laborbranĉoj, kies produktoj determinas la valoron de la laborforto, do ekz-e pri malkreskanta produktadforto de la laboro pro kreskanta malfekundeco de la grundo kaj responda plikostiĝo de la grundproduktoj. Ni supozu ke la labortago estas dekduhora, ĝia valorprodukto 6 ŝ, el kiu la duono anstataŭas la valoron d ela laborforto, la alia duono konsistigas la plusvaloron. La labortago dividiĝas do en 6 horojn da necesa laboro kaj en 6 horojn da plusvaloro. Ni supozu ke pro la plikostiĝo de la grundproduktoj la valoro de la laborforto kreskas de 3 al 4 ŝ., do la necesa laborforto de 6 al 8 horoj. Se la labortago restas senŝanĝa, tiam la pluslaboro falas de 6 al 4 horoj, la plusvaloro de 3 al 2 ŝ. Se la labortago estas longigita je 2 horoj, do de 12 al 14 horoj, tiam la pluslaboro estas 6 horoj, la plusvaloro 3 ŝ., sed ĝia grando falas kompare kun la valoro de la laborforto, mezurata per la necesa laboro. Se la labortago longiĝas je 4 horoj, de 12 al 16 horoj, tiam la proporciaj grandoj de plusvaloro kaj valoro de la laborforto, pluslaboro kaj necesa laboro, restas senŝanĝaj, sed la absoluta grando de la plusvaloro kreskas de 3 al 4 ŝ., tiu de la pluslaboro de 6 al 8 laborhoroj, do je $^{1}/_{3}$ aŭ je $33^{1}/_{3}$ elcentoj. Ĉe malkreskanta produktadforto de la laboro kaj samtempa longigo de la labortago la absoluta grando de la plusvaloro povas do resti senŝanĝa, dum ĝia proporcia grando falas; ĝia

proporcia grando povas resti senŝanĝa, dum ĝia absoluta grando kreskas, kaj, laŭ la grado de la longigo, ambaŭ povas kreski.

En la tempospaco de 1799 ĝis 1815 la kreskantaj prezoj de la vivrimedoj en Anglio kondukis al nominala altiĝo de la salajroj, kvankam la realaj, en vivrimedoj esprimitaj salajroj malkreskis. El tio, West kaj Ricardo konkludis, ke la malpliiĝo de la produktadforto de la kampkultura laboro kaŭzis falon de la kvoto de la plusvaloro, kaj faris tiun supozon, validan nur en ilia fantazio, la ekirpunkto de gravaj analizoj pri la relativa grandrilato de salajro, profito kaj grundrento. Sed danke al pli altigita laborintenso kaj al la trudita longigo de la labortempo la plusvaloro tiam estis kreskinta absolute kaj relative. Tiu estis la epoko, en kiu la senbrida longigo de la labortago fariĝis ĝenerala,[19] la periodo, speciale karakteriza pro la akcelita kresko jen de la kapitalo, jen de la mizero.[20]

19 „Greno kaj laboro malofte kongruas; sed ekzistas evidenta limo, trans kiu ili ne estas disigeblaj. La eksterordinaraj klopodoj de la laboristaj klasoj en tempoj de altkosteco, kiuj kaŭzas la malkreskon de la salajroj, pri kiu temis en la eldiroj" (nome antaŭ la parlamentaj enketkomisionoj de 1814-1815), „faras la meriton de iuj kaj certe favoras la kreskon de la kapitalo. Sed neniu home sentanta povas deziri, ke ili okazu en sama alteco kaj senfine. Ili estas ekstreme admirindaj kiel provizora elturniĝo; sed se ili okazus ĉiam, ili iom post iom efikus simile kiel loĝantaro kiu, koncerne sian vivtenadon, estus premata ĝis la plej ekstrema limo." (Malthus: Inquiry into the Nature and Progress of Rent", Londono, 1815, p. 48, noto) Malthus havas la honoron emfazi la longigon de la labortago, rekte priparolatan ankaŭ aliloke en sia pamfleto, dum Ricardo kaj aliaj, vide al la plej akraj faktoj, baziĝis en ĉiuj siaj esploraĵoj sur la konstantan grandon de la labortago. Sed la plej konservativaj interesoj, kies servisto Malthus estis, malebligis al li vidi, ke la senbrida longigo de la labortago, samtempe kun eksterordinara disvolvado de la maŝinaro kaj de la ekspluatado de la virin- kaj infan-laboro, devis „superfluigi" grandan parton de la laborista klaso, nome ekde kiam la postulo pro la milito kaj la angla monopolo de la mondmerkato ĉesis. Estis kompreneble multe pli komforte kaj multe pli konforme al la interesoj de la regantaj klasoj, kiujn Malthus tipe pastrece idoligas, klarigi tiun „superloĝantaron" el la eternaj leĝoj de la naturo ol el la nur historiaj naturleĝoj de la kapitalisma produktado.

20 „Baza kaŭzo de la kresko de la kapitalo dum la milito kuŝis en la pli grandaj klopodoj kaj eble ankaŭ la pli grandaj malhavoj de la laborantaj klasoj, kiuj estas en ĉiu socio la plej multnombraj. Pro la malabundeco de sia situacio, pli da virinoj kaj da infanoj estis devigitaj eklabori; kaj tiuj, kiuj jam antaŭe estis laboristoj, estis pro la samaj kaŭzoj devigitaj dediĉi pli grandan parton de sia tempo al la pliigo de la produktado." ([Malthus]: *„Essays on Political Econ. in which are illustrated the Principal Causes of the Present National Distress"*, Londono, 1830, p. 248)

2. Kreskantaj intenso kaj produktadforto de la laboro kun samtempa mallongigo de la labortago:

Kreskanta produktadforto de la laboro kaj ĝia kreskanta intenso efikas samforme al unu flanko. Ambaŭ pliigas la kvanton de produktoj en ĉiu tempoparto. Ambaŭ mallongigas do parton de la labortago, kiun la laboristo bezonas por produktado de siaj vivrimedoj aŭ de ties ekvivalentoj. La absoluta minimuma limo de la labortago estas entute difinita de tiu lia necesa, sed kunpremebla parto. Se la tuta labortago ŝrumpus al tiu ekstrema limo, tiam la pluslaboro malaperus, kio maleblas sub la reĝimo de la kapitalo. La forigo de la kapitalisma produktadformo ebligas limigi la labortagon al la necesa laboro. Sed tiu, sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj, etendus sian spacon. Unuflanke ĉar la vivkondiĉoj de la laboristo fariĝas pli riĉaj kaj liaj vivpretendoj pli grandaj. Aliflanke parto de la nuna pluslaboro fariĝus parto de la necesa laboro, nome la laboro necesa por starigi fondusojn por socia rezervo kaj akumulado.

Ju pli la produktadforto de la laboro kreskas, des pli la labortago mallongigeblas, kaj ju pli la labortago mallongiĝas, des pli la intenso de la laboro povas kreski. El socia vidpunkto, la produktadforto de la laboro kreskas ankaŭ kun ties raciigo. Tiu inkludas ne nur la raciigon de la produktadrimedoj, sed ankaŭ la evitadon de senutila laboro. Dum la kapitalisma produktadmaniero devigas raciigon en ĉiu individua agado, ĝia anarĥia sistemo de konkurenco produktas la plej senbridan malŝparadon de la sociaj produktadrimedoj kaj laborfortoj, apud sennombraj funkcioj nun nemalhaveblaj, sed per si mem superfluaj.

Kun donitaj intenso kaj produktadforto de la laboro, la parto de la socia labortago necesa por la materia produktado estas des pli mallonga, la tempoparto por libera, spirita kaj socia agado de la individuoj des pli granda, ju pli egalece la laboro estas dividita inter ĉiuj laborkapablaj membroj de la socio, ju malpli socia tavolo povas demeti la naturneceson de la laboro de si mem kaj trudi ĝin al alia tavolo. La absoluta limo por mallongigi la labortagon estas ĉi-flanke la ĝeneraleco de la laboro. En la kapitalisma socio oni produktas liberan tempon por unu klaso per transformado de ĉia vivtempo de la amasoj en labortempon.

# *DEKSESA ĈAPITRO Diversaj formuloj por la kvoto de la plusvaloro*

Ni vidis, ke la kvoto de la plusvaloro prezentiĝas en la formuloj:

I.

$^{\text{plusvaloro}}/_{\text{varia kapitalo}}\ (^{p}/_{v})$

$= {}^{\text{plusvaloro}}/_{\text{valoro de la laborforto}}$

$= {}^{\text{pluslaboro}}/_{\text{necesa laboro}}.$

La du unuaj formoj prezentas la proporcion de valoroj, kion la tria prezentas kiel proporcio de la tempoj en kiuj tiuj valoroj estas produktataj. Oni do trovas ilin ja laŭ la fakto, sed ne konscie ellaboritaj en la klasika politika ekonomio. Sed ĉi tie ni renkontas la derivitajn formulojn:

II.

$^{\text{pluslaboro}}/_{\text{labortago}}$ [21]

$= {}^{\text{plusvaloro}}/_{\text{produktvaloro}}$

$= {}^{\text{plusprodukto}}/_{\text{ĉiomprodukto}}.$

Unu sama proporcio estas ĉi tie esprimita sinsekve en la formo de la labortempoj, de la valoroj en kiuj ili enkorpiĝas, de la produktoj, en kiuj tiuj valoroj ekzistas. Kompreneble ni premisas, ke sub la valoro de la produkto komprenendas nur la valorprodukto de la labortago, sed ne la konstanta parto de la produktvaloro.

En ĉiuj ĉi formuloj la reala ekspluatgrado de la laboro, aŭ la kvoto de la plusvaloro, estas esprimita malĝuste. Ni supozu, ke la labortago estas 12-hora. Kun la aliaj supozoj de nia pli frua ekzemplo en tiu ĉi kazo la reala ekspluatgrado de la laboro prezentiĝas en jenaj proporcioj:

6 horoj da pluslaboro / 6 horoj da necesa laboro

= plusvaloro de 3 ŝ. / varia kapitalo de 3 ŝ.

= 100 elcentoj.

Sed laŭ la formuloj II ni ricevas:

6 horoj da pluslaboro / labortago de 12 horoj

21 En la franca eldono Markso metis tiun unuan formulon inter parentezojn, „ĉar la nocio de la pluslaboro ne troviĝas klare esprimita en la burĝa politika ekonomio”. -vl

= plusvaloro de 3 ŝ. / valorprodukto de 6 ŝ.

= 50 elcentoj.

Tiuj derivitaj formuloj esprimas efektive la proporcion, en kiu la labortago aŭ ĝia valorprodukto dividiĝas inter kapitalisto kaj laboristo. Do, se ili validas kiel rektaj esprimoj de la grado de memvalorigo de la kapitalo, tiam validas la malĝusta leĝo: La pluslaboro aŭ la plusvaloro povas neniam atingi 100 elcentojn.[22] Ĉar la pluslaboro povas estigi ĉiam nur alikvotan parton de la labortago aŭ la plusvaloro ĉiam nur alikvotan parton de la valorprodukto, tial la pluslaboro estas nepre ĉiam pli malgranda ol la labortago aŭ la plusvaloro ĉiam pli malgranda ol la valorprodukto. Sed por esti kiel $^{100}/_{100}$, ili devus esti samaj. Por ke la pluslaboro sorbu la tutan labortagon (temas ĉi tie pri la mezuma tago de la laborsemajno, de la laborjaro ktp), la necesa laboro devus fali al nulo. Sed se malaperas la necesa laboro, tiam malaperas ankaŭ la pluslaboro, ĉar tiu estas nur funkcio de la unua. La proporcio *pluslaboro / labortago = plusvaloro / valorprodukto* povas do neniam atingi la limon 100 / 100 kaj eĉ malpli kreski al 100 + x / 100. Sed ja la kvoto de la plusvaloro aŭ la reala ekspluatgrado de la laboro. Ekz-e laŭ la pritakso de s-ro L. de

22 Tiel ekz-e en „Dritter Brief an v. Kirchmann von Rodbertus. Widerlegung der Ricardo'schen Theorie von der Grundrente und Begründung einer neuen Rententheorie [Tria Letero al v. Kirchmann de Rodbertus. Refuto de la teorio de Ricardo pri la grundrento kaj argumentado de nova rentteorio", Berlino, 1851]. Mi revenos poste al tiu skribaĵo, kiu malgraŭ sia malĝusta teorio pri la grundrento komprenas la esencon de la kapitalisma produktado. – {Aldono de Frederiko Engelso al la 3-a eldono:} Oni vidas ĉi tie, kiom kompleze Markso prijuĝas siajn antaŭulojn, ekde kiam li trovis ĉe ili realan progreson, ĝustan penson. Intertempe la publikigo de la leteroj de Rodbertus al Rud. Meyer sufiĉe limigis la agnoskon. Tie legeblas: „Oni devas savi la kapitalon ne nur kontraŭ la laboro, sed ankaŭ kontraŭ ĝi mem, kaj tio okazas efektive plej bone, se oni komprenas la agadon de la entreprenisto-kapitalisto kiel popol- kaj ŝtat-ekonomiajn funkciojn, kiuj estas al ĝi delegitaj per la kapitalproprieto, kaj ĝian profiton kiel formon de oficista salajro, ĉar ni ankoraŭ ne konas alian socian organiziĝon. Sed oficistaj salajroj povas esti reguligataj kaj ankaŭ malaltigataj, se ili forprenas tro el la laborista salajro. Do, ankaŭ la enrompiĝo de Markso en la socion – tiel mi ŝatus nomi lian libron – estas rebatenda … Entute la libro de Markso estas ne tiom esplorado pri la kapitalo ol polemiko kontraŭ la hodiaŭa kapitalformo, kiun li konfuzas kun la kapitalnocio mem, el kio ĝuste estiĝas liaj eraroj." („*Briefe etc. von Dr. Rodbertus-Jagetzow* [Leteroj ktp de d-ro Rodbertus-Jagetzow], eld. de d-ro Rud. Meyer, Berlino, 1881, I-a vol., p. 111, 48-a letero de Rodbertus) – En tiaj ideologiaj plataĵoj la efektive aŭdacaj impetoj de la Rodbertaj „sociaj leteroj" ensabliĝas. – F. E.

Lavergne, laŭ kiu la angla kamplaboristo ricevas nur kvaronon de la kapitalisto (farmisto), sed tri kvaronojn de la produkto[23] aŭ de ties valoro, kiel ajn la predo poste plu dividiĝas inter kapitalisto kaj grundproprietulo ktp. La pluslaboro de la angla kampkulturisto estas en proporcio al lia necesa laboro = 3 : 1, elcentaĵo de la ekspluatado de 300 elcentoj.

La metodo de la klasika skolo, trakti la labortagon kiel konstantan grandon, estis firmigita per aplikado de la formuloj II, ĉar tie oni ĉiam komparas la pluslaboron kun labortago de donita grando. Same, se oni konsideras ekskluzive la dividon de la valorprodukto. La labortago, kiu jam konkretiĝis en valorprodukto, estas ĉiam labortago kun donitaj limoj.

La prezentado de plusvaloro kaj de valoro de la laborforto kiel frakcioj de la valorprodukto – prezentmaniero, kiu cetere elkreskas el la kapitalisma produktadmaniero kaj kies signifo montriĝos poste – kaŝas la specifecon de la kapitalrilato, nome la interŝanĝon de la varia kapitalo kun la vivanta laborforto kaj sekve la ekskludadon de la laboristo el la produkto. Anstataŭas ĝin la malĝusta ŝajno de asociadrilato, en kiu laboristo kaj kapitalisto dividas la produkton laŭ la proporcio de ĝiaj diversaj estiĝfaktoroj.[24]

Cetere la formuloj II estas ĉiam retransformeblaj en la formulojn I. Se ni havas ekz-e $^{\text{pluslaboro de 6 horoj}}/_{\text{labortago de 12 horoj}}$, tiam la necesa labortempo = labortempo de dek du horoj minus pluslaboro de ses horoj, kaj tiel rezultas:

$^{\text{pluslaboro de 6 horoj}}/_{\text{necesa laboro de 6 horoj}} = {}^{100}/_{100}$.

Tria formulo, kiun mi okaze jam anticipis, estas:

III.

$^{\text{plusvaloro}}/_{\text{valoro de la laborforto}}$

$= {}^{\text{pluslaboro}}/_{\text{necesa laboro}}$

---

23 La parto de la produkto, kiu anstataŭas nur la elspezitan konstantan kapitalon, estas kompreneble deprenita en tiu ĉi kalkulo. – S-ro L. de Lavergne, blinda admiranto de Anglio, donas prefere pli malaltan ol tro altan proporcion.

24 Ĉar ĉiaj evoluintaj formoj de la kapitalisma produktadprocezo estas formoj de kunlaborado, kompreneble nenio pli facilas ol abstrakti ĝian specife antagonisman karakteron kaj tiel transfabeli ilin en formojn de libera asociiĝo, ekz-e en grafo A. de Laborde: *„De l'Esprit de l'Association dans tous les intérêts de la Communauté"*, Parizo, 1818. La jankio H. Carey faras tiun artaĵon kun la sama sukceso foje eĉ por la kondiĉoj de la sklavsistemo.

= nepagata laboro/pagata laboro.

La miskompreno, al kiu la formulo nepagata laboro/pagata laboro povus delogi, kvazaŭ la kapitalisto pagus la laboron kaj ne la laborforton, jam ne povas okazi post la antaŭe donita klarigo. Nepagata laboro / pagata laboro estas nur populara esprimo por pluslaboro / necesa laboro. La kapitalisto pagas la valoron, respektive la prezon de la laborforto, kiu povas deflankiĝi de ĝi, kaj ricevas kompense la disponon pri la vivanta laborforto mem. Lia uzado de tiu laborforto dividiĝas en du tempopartojn. Dum la unua tempoparto la laboristo produktas nur valoron = valoron de sia laborforto, do nur ekvivalenton. Por la antaŭpagita prezo de la laborforto la kapitalisto tiel ricevas samprezan produkton. Estas kvazaŭ li estus aĉetinta la produkton en la bazaro mem. Sed en la tempoparto de la pluslaboro la uzado de la laborforto kreas valoron por la kapitalisto, sen ke tio kostus ion al li.[25] Li havas tiun fluidigon de la laborforto senpage. Tiusence la pluslaboro povas nomiĝi nepagata laboro.

La kapitalo estas do ne nur komando super laboro, kiel diras A. Smith. Ĝi estas esence komando super nepagata laboro. Ĉia plusvaloro, en kiu ajn formo de profito, interezo, rento ktp ĝi poste kristaliĝas, estas en sia substanco materiiĝo de nepagata labortempo. La sekreto de la memplivalorigo de la kapitalo solviĝas en ties disponon pri determinita kvanto de nepagata fremda laboro.

25 Kvankam la fiziokratoj ne komprenis la sekreton de la plusvaloro, tamen estis al ili klare, ke „estas sendependa kaj disponebla riĉaĵo, kiun li” (ties posedanto) „ne aĉetis kaj kiun li vendas”. (Turgot: *„Réflexions sur la Formation et la Distribution des Richesses”*, p. 11)

# SESA SEKCIO La salajro

## *DEKSEPA ĈAPITRO Transformo de valoro resp. prezo de la laborforto en salajron*

Sur la surfaco de la burĝa socio aperas la salajro de la laboristo kiel prezo de la laboro, certa kvanto da mono, pagata por certa kvanto da laboro. Oni parolas tie pri la valoro de la laboro kaj nomas ĝian monesprimon ĝian necesan aŭ naturan prezon. Oni parolas aliflanke pri merkatprezoj de la laboro, do pri prezoj, kiuj oscilas super aŭ sub ĝia necesa prezo.

Sed kiu estas la valoro de varo? Konkreta formo de la socia laboro elspezita por ĝia produktado. Kaj per kio ni mezuras la grandon de ĝia valoro? Per la grando de la laboro entenata en ĝi. Per kio do la valoro ekz-e de dekduhora labortago estus determinita? Per la 12 laborhoroj entenataj en labortago de 12 horoj, kio estas absurda taŭtologio.[1]

Por esti en la merkato vendata kiel varo, la laboro devus ĉiukaze ekzisti, antaŭ ol esti vendata. Sed se la laboristo povus doni al ĝi memstaran ekziston, tiam li vendus varon kaj ne laboron.[2]

Sendepende de tiuj kontraŭdiroj, rekta interŝanĝo de mono, do de

---

1 „Ricardo, sufiĉe sprita, evitas malfacilaĵon, kiu unuavide ŝajnas kontraŭstari lian teorion, nome ke la valoro dependas de la laborkvanto uzita en la produktado. Se oni strikte insistas pri tiu principo, tiam sekvas el ĝi, ke la valoro de la laboro dependas de la laborkvanto elspezita por ĝia produktado – kio estas evidente sensencaĵo. Per lerta movo, Ricardo dependigas do la valoron de la laboro de la kvanto de la laboro necesa por produkti la salajron; aŭ, por paroli per liaj propraj vortoj, li asertas, ke la valoro de la laboro estas taksenda laŭ la laborkvanto necesa por la produktado de la salajro; per tio li komprenas la laborkvanton, kiu necesas por produktado de la mono aŭ de la varo, kiun oni donas al la laboristo. Same bone oni povus diri, ke la valoro de tolo ne estas taksata laŭ la laborkvanto aplikata al ĝia produktado, sed laŭ la laborkvanto aplikita al la produktado de la arĝento, kontraŭ kiu la tolo estas interŝanĝata." ([S. Bailey,] *„A Critical Dissertation on the Nature, etc., of Value"*, p. 50, 51)

2 „Se vi nomas laboron varo, tiam ĝi tamen ne egalas al varo, kiu estas unue produktata cele al interŝanĝo kaj poste surmerkatigata, kie ĝi estas interŝanĝata kun aliaj varoj, kiuj hazarde troviĝas kun aliaj varoj sur la merkato; laboro estas kreata en la momento, en kiu ĝi estas surmerkatigata, ĝi estas eĉ surmerkatigata antaŭ ol ĝi estas kreita." (*„Observations on some verbal disputes etc."*, p. 75, 76)

konkretigita laboro, kun vivanta laboro aŭ nuligus la valorleĝon, kiu ĝuste surbaze de la kapitalisma produktado libere evoluas, aŭ nuligus la kapitalisman produktadon mem, kiu baziĝas ĝuste sur salajra dunglaboro. La labortago de 12 horoj prezentiĝas ekz-e en monvaloro de 6 ŝ. Aŭ oni interŝanĝas ekvivalentojn, kaj tiam la laboristo ricevas por dekduhora laboro 6 ŝilingojn. La prezo de lia laboro estus egala al la prezo de lia produkto. En tiu kazo li produktus nenian plusvaloron por la aĉetinto de lia laboro, la ses ŝilingoj ne transformiĝus en kapitalon, la bazo de la kapitalisma produktado malaperus, sed ĝuste sur tiu bazo li vendas sian laboron kaj lia laboro estas dunglaboro. Aŭ li ricevas por 12 horoj malpli ol 6 ŝ., do malpli ol 12 horojn da laboro. Dek du horoj da laboroj interŝanĝiĝas kontraŭ 10, 6 ktp horoj da laboro. Tiu egaligo de malsamaj grandoj nuligas ne nur la valordeterminadon. Tia sin mem nuliganta kontraŭdiro entute ne eldireblas aŭ formuleblas kiel leĝo.

Ne utilas klarigi la interŝanĝon de pli kontraŭ malpli da laboro el la formdiferenco, diri ke ĝi estas jen konkretigita, jen vivanta.[3] Tio estas des pli absurda, ĉar la valoro de varo estas determinata ne per la kvanto de reale en ĝi konkretigita, sed per la kvanto de por ĝia produktado necesa vivanta laboro. Ni supozu ke varo prezentas 6 laborhorojn. Se oni faras inventojn, per kiuj ĝi produkteblas en 3 horoj, tiam la valoro ankaŭ de la jam produktita varo falas je la duono. Ĝi prezentas nun 3 anstataŭ antaŭe 6 horojn da necesa socia laboro. Estas do la kvanto da laboro necesa por ĝia produktado, ne ties konkreta formo, per kiu ĝia valorgrando estas determinata.

Tio, kio rekte alpaŝas la monposedanton en la varmerkato, estas fakte ne la laboro, sed la laboristo. Tio, kion la laboristo vendas, estas lia laborforto. Ekde kiam lia laboro vere komenciĝas, ĝi ja ĉesis aparteni al li, do jam ne vendeblas de li. La laboro estas la substanco kaj la imanenta mezuro de la valoroj, sed ĝi mem ne havas valoron.[4]

En la esprimo „valoro de la laboro” la valornocio ne estas komplete estingita, sed inversigita en sian malon. Ĝi estas imaga esprimo, kiel ekz-e la valoro de la tero. Tiaj imagaj esprimoj fontas tamen el la produktad-

3 „Oni devis interkonsenti” (jen kroma eldono de la „contrat social” [„socitraktato”]), „ke, kiam ajn farita laboro estas interŝanĝenda kontraŭ farenda laboro, la lasta” (la kapitalisto) „devus ricevi pli altan valoron ol la unua” (la laboristo). (Sismonde (t.e. Sismondi): *„De la Richesse Commerciale”*, Ĝenevo, 1803, vol. I, p. 37)

4 „Laboro, la ekskluziva mezurilo de la valoro … la kreanto de ĉia riĉaĵo, ne estas varo.” (Th. Hodgskin, l.c., p. 186)

kondiĉoj mem. La fakto, ke en sia aperformo la aferoj prezentiĝas ofte inversigite, estas sufiĉe konata en ĉiuj sciencoj, escepte en la politika ekonomio.[5]

La klasika politika ekonomio senkritike pruntis el la ĉiutaga vivo la kategorion „prezo de la laboro”, por poste demandi sin, kiel tiu prezo estas determinata. Ĝi baldaŭ rimarkis, ke la ŝanĝo en la rilato de postulo kaj propono por la prezo de la laboro, kiel por tiu de ĉiu alia varo, klarigas nenion krom ĝian ŝanĝiĝon, do la osciladon de la merkatprezoj sub aŭ super certa grando. Se postulo kaj propono kovriĝas, tiam, sub cetere senŝanĝaj cirkonstancoj, la oscilado de la prezoj ĉesas. Sed tiam postulo kaj propono ankaŭ ĉesas klarigi ion ajn. La prezo de la laboro, kiam postulo kaj propono kovriĝas, estas ĝia sendepende de postulo kaj propono determinita, ĝia natura prezo, kiu estis tiel trovita kiel la vere analizenda objekto. Aŭ oni prenis iom pli longan periodo de oscilado de la merkatprezo, ekz-e jaron, kaj tiam trovis, ke ĝia supren- kaj suben-moviĝo kompensiĝas al meza, mezuma grando, al konstanta grando. Tiu estis kompreneble determinenda alie ol la sin kompensiĝantaj deflankiĝoj de ĝi mem. Tiu prezo, kiu entenas la osciladojn kaj funkcias kiel ties reguliganto, la „necesa prezo” (de la fiziokratoj) aŭ „natura prezo” de la laboro (laŭ Adam Smith) povas esti valoro esprimita nur en mono, kiel ĉe aliaj varoj. Tiamaniere la politika ekonomio kredis, pere de la hazardaj prezoj de la laboro, atingi ĝian valoron. Kiel ĉe aliaj varoj oni determinis

5 Tamen, deklari tiajn esprimojn kiel poetan licencon, montras nur la senpovecon de la analizo. Kontraŭ la senenhava frazo de Prudono: „Oni diras pri la laboro, ke ĝi havas valoron, ne kiel vera varo, sed koncerne la valorojn, kiujn oni supozas potenciale entenatajn en ĝi. La valoro de la laboro estas figura esprimo …”, mi rimarkigas do: „Li vidas en la varo laboro, kiu estas terura realaĵo, nur gramatikan elipson.Laŭ tio la tuta nuntempa socio, bazita sur la varkaraktero de la laboro, estas de nun poeta licenco, bazita sur figurasenca esprimo. Se la socio volas „elimini ĉiujn neelteneblaĵojn” [I, p. 97], sub kiuj ĝi suferas, nu, tiam ĝi eliminu la maldecajn esprimojn, ŝanĝu la lingvon; kaj por tio ĝi bezonas nur turni sin al la akademio por postuli de ĝi novan eldonon de ĝia vortaro. (Karlo Markso: La mizero de la filozofio …, v.c., p. 73)

Kompreneble estas ankoraŭ pli komforte pensi nenion pri valoro. Tiam eblas senprobleme submeti ĉion al tiu nocio. Ekz-e J. B. Say: Kio estas valoro? Respondo: „Tio, kion aĵo valoras”, kaj kio estas prezo? Respondo: „La valoro de aĵo esprimita en mono.” Kaj kial „la laboro de la tero … havas valoron? Ĉar oni atribuas prezon al ĝi”. Do valoro estas, kion aĵo valoras, kaj la tero havas „valoron”, ĉar oni „esprimas” ĝian valoron „en mono”. Tiu estas ĉiukaze tre simpla metodo interkompreniĝi pri la kialo (why) kaj la tialo (wherefore) de la aferoj.

tiun valoron plue per la produktadkostoj. Sed kiuj estas la produktadkostoj – de la laboristo, t.e. la kostoj por produkti aŭ reprodukti la laboriston mem? Tiu demando subŝoviĝis al la politika ekonomio kiel la origina, ĉar ili turniĝis per la produktadkostoj de la laboro – laboro kiel tia – en rondo kaj ne povis iri antaŭen. Do, tio, kion ili nomas valoro de la laboro (*value of labour*), estas fakte la valoro de la laborforto, kiu ekzistas en la persono de la laboristo kaj kiu distingiĝas disde sia funkcio, la laboro, same multe kiel maŝino disde siaj operacioj. Ili tiom okupiĝis pri la diferenco inter la merkatprezoj de la laboro kaj ties tiel nomata valoro, pri la rilato de tiu valoro al la profitkvoto, al la varvaloroj produktitaj pere de ĝi, ktp, ke oni neniam malkovris, ke la vojo de la analizo iris ne nur de la merkatprezoj de la laboro al ties supozata valoro, sed ke ĝi kondukis al tio, ke tiu supozata valoro de la laboro estis siavice dissolvita en valoro de la laborforto. La nekonscio pri tiu rezulto de ilia propra analizo, la senkritika alpreno de la kategorioj „valoro de la laboro", „natura prezo de la laboro" ktp kiel lastaj adekvataj esprimoj de la traktata valorrilato, implikis, kiel ni vidos poste, la klasikan politikan ekonomion en nesolveblajn konfuziĝojn kaj kontraŭdirojn, dum ĝi donis al la vulgarekonomiko sekuran bazon por ĝia supraĵeco, kiu principe dediĉas sin nur al la ŝajno.

Ni vidu unue, kiel valoro kaj prezoj de la laborforto prezentiĝas en tiu ŝanĝita formo.

Oni scias, ke la tagvaloro de la laborforto kalkuliĝas laŭ certa vivodaŭro de la laboristo, kiu respondas al certa daŭro de la labortago. Ni supozu, ke la kutima labortago estas 12 horoj kaj la tagvaloro de la laborforto 3 ŝilingoj, la monesprimo de valoro, en kiu prezentiĝas 6 laborhoroj. Se la laboristo ricevas 3 ŝilingojn, tiam li ricevas la valoron de sia dum 12 horoj funkcianta laborforto. Se tiu tagvaloro de la laborforto esprimiĝas kiel valoro de la taglaboro, tiam validas la formulo: La dekduhora laboro havas valoron de 3 ŝ. La valoro de la laborforto tiel determinas la valoron de la laboro aŭ, en mona esprimo, ĝian necesan prezon. Sed se la prezo de la laborforto deflankiĝas de ĝia valoro, tiam same la prezo de la laboro deflankiĝas de ĝia tiel nomata valoro.

Ĉar la valoro de la laboro estas nur malracia esprimo por la valoro de la laborforto, evidentas ke la valoro de la laboro devas esti ĉiam pli malgranda ol ĝia valorprodukto, ĉar la kapitalisto igas la laborforton funkcii ĉiam pli longe ol necesas por la reproduktado de ĝia propra valoro. En la supra ekzemplo la valoro de la dum 12 horoj funkcianta laborforto estas 3 ŝ., valoro, por kies reproduktado ĝi bezonas 6 horojn. Sed ĝia valorpro-

dukto estas 6 ŝ., ĉar ĝi fakte funkcias dum 12 horoj, kaj ĝia valorprodukto dependas ne de ĝia propra valoro, sed de la daŭro de ĝia funkciado. Oni ricevas tiel la unuavide absurdan rezulton, ke laboro, kiu kreas valoron de 6 ŝilingoj, posedas valoron de 3 ŝilingoj.[6]

Ni vidas krome: La valoro de 3 ŝilingoj, en kiu la pagata parto de la labortago, do seshora laboro prezentiĝas, aperas kiel valoro aŭ prezo de la tuta 12-hora labortago, kiu entenas 6 ne pagatajn horojn. La formo de la salajro estingas do ĉian spuron de la divido de la labortago en necesan laboron kaj pluslaboron, en pagatan kaj ne pagatan laboron. Ĉia laboro aperas kiel pagata laboro. Ĉe la servutlaboro distingiĝas space kaj tempe, palpeble, la laboro de la servutulo por si mem kaj lia deviga laboro por la feŭda sinjoro. Ĉe la sklavlaboro, eĉ tiu parto de la labortago, dum kiu la sklavo anstataŭigas nur la valoron de siaj propraj vivrimedoj, dum kiu li do fakte laboras por si mem, aperas kiel laboro por lia mastro. Ĉia lia laboro aperas kiel nepagata laboro.[7] Ĉe la salajra dunglaboro, inverse, eĉ la pluslaboro aŭ nepagata laboro aperas kiel pagata. Jen la proprietrilato kaŝas la laboron por si mem de la sklavo, jen la monrilato la senpagan laboron de la salajra dunglaboristo.

Kompreneblas do la decida graveco de la transformiĝo de valoro kaj prezo de la laborforto en la formon de salajro aŭ en valoron kaj prezon de la laboro mem. Sur tiu aperformo, kiu faras la realan rilaton nevidebla kaj montras precize ĝian malon, baziĝas ĉiuj juraj konceptoj de la laboristo kaj de la kapitalisto, ĉiuj mistifikaĵoj de la kapitalisma produktadmaniero, ĉiuj ĝiaj liberec-iluzioj, ĉiuj apologiaj trukoj de la vulgarekonomiko.

Kvankam la mondhistorio bezonas multan tempon por malkovri la sekreton de la salajro, aliflanke nenio kompreneblas pli facile ol la neceso, la ekzistkialo de tiu aperformo.

La interŝanĝo inter kapitalo kaj laboro prezentiĝas en la perceptado unue sammaniere kiel la aĉeto kaj vendo de ĉiuj aliaj varoj. La aĉetisto

6 Kp „*Zur Kritik der politischen Oekonomie*”, p. 40 <Vd MEW, vol. 13, p. 47>, kie mi anoncas, ke ĉe la analizo de la kapitalo solvendas jena problemo: „Kiel produktado surbaze de la per nura labortempo determinita interŝanĝvaloro kondukas al la rezulto, ke la interŝanĝvaloro de la laboro estas malpli granda ol la interŝanĝvaloro de ĝia produkto?”

7 La „*Morning Star*”, ridinde naiva londona liberkomerca organo, asertis ade dum la Usona Interna Milito kun ĉia home ebla morala indigno, ke la nigruloj en la „*Confederate States*” laboras tute senpage. Ĝi prefere komparintus la tagkostojn de tia nigrulo kun tiuj de la libera laboristo ekz-e en la *East End* de Londono.

donas certan monsumon, la vendisto artiklon malsaman ol mono. La jura konscio rekonas ĉi tie nur diferencon kun aliaj kontraktoj, kiu esprimiĝas en la sufiĉe ekvivalentaj formuloj: *Do ut des, do ut facias, facio ut des, kaj facio ut facias* [Mi donas por ke vi donu; mi donas por ke vi faru; mi faras por ke vi donu; kaj mi faras, por ke vi faru].

Krome: Ĉar interŝanĝvaloro kaj uzvaloro estas per si mem ne kunmezureblaj grandoj, tial la esprimo „valoro de la laboro”, „prezo de la laboro” ŝajnas ne pli malracia ol la esprimo „valoro de kotono”, „prezo de kotono”. Aldoniĝas, ke la laboristo estas pagata post kiam li liveris sian laboron. Sed en sia funkcio de pagilo la mono realigas postfare la valoron aŭ prezon de la liverita artiklo, do en la donita kazo la valoron aŭ prezon de la liverita laboro. Fine la „uzvaloro”, kiun la laboristo liveras al la kapitalisto, estas efektive ne lia laborforto, sed ties funkcio, certa utila laboro, tajlorlaboro, ŝuista laboro, ŝpinlaboro ktp. Ke la sama laboro estas ĉe la alia flanko ĝenerala valorestiga elemento, eco per kiu ĝi distingiĝas disde ĉiuj aliaj varoj, tio estas ekster la atingo de la ordinara konscio.

Ni metu nin sur la starpunkton de la laboristo, kiu ricevas por dekduhora laboro ekz-e la valorprodukton de seshora laboro, do ekz-e 3 ŝilingojn, tiam lia dekduhora laboro estas por li efektive la aĉetrimedo de la tri ŝilingoj. La valoro de lia laborforto povas varii kun la valoro de liaj kutimaj vivirimedoj de 3 ĝis 4 ŝilingoj aŭ de 3 ĝis 2 ŝilingoj, aŭ ĉe senŝanĝa valoro de lia laborforto ĝia prezo, pro ŝanĝantaj kondiĉoj de postulo kaj propono, povas kreski al 4 ŝilingoj aŭ fali al 2 ŝ., ĝi estas ĉiam dekdu laborhoroj. Tiu cirkonstancoj delogis inverse Adamon Smith, kiu traktas la labortagon kiel konstantan grandon[8], al la aserto, ke la valoro de la laboro estas konstanta, kvankam la valoro de la vivrimedoj kreskas kaj la sama labortago do prezentiĝas en pli aŭ malpli da mono por la laboristo.

Ni konsideru aliflanke la kapitaliston. Tiu volas ja ricevi kiom eble plej multe da laboro por kiom eble malplej da mono. Pro tio interesas lin nur la diferenco inter la prezo de la laborforto kaj la valoro kiun ties funkcio kreas. Sed li provas aĉeti ĉian varon kiom eble plej malmultekoste, kaj li klarigas al si ĉie sian profiton el la simpla trompado, el la aĉeto sub kaj la vendo super la valoro. Pro tio li ne sukcesas kompreni, ke, se io tia kiel valoro de la laboro vere ekzistus, kaj se li vere pagus tiun valoron, nenia kapitalo ekzistus, lia mono ne transformiĝus en kapitalon.

8 A. Smith nur hazarde aludas la variadon de la labortago okaze de la popeca salajro.

Krome la reala moviĝo de la salajro montras fenomenojn, kiuj ŝajnas pruvi, ke ne la valoro de la laborforto estas pagata, sed la valoro de ĝia funkcio, de la laboro mem. Tiuj fenomenoj redukteblas al du grandaj klasoj. Unue: ŝanĝo de la salajro kun ŝanĝiĝanta longo de la labortago. Oni povus same bone konkludi, ke ne la valoro de la maŝino, sed tiu de ĝia funkciado estas pagata, ĉar kostas pli, prunti maŝinon por unu semajno ol por unu tago. Due: la individua diferenco de la salajroj de diversaj laboristoj, kiuj plenumas la saman funkcion. Tiu sama diferenco troviĝas, sed sen kaŭzo por iluzioj, ankaŭ en la sistemo de sklavismo, kie oni libere, senorname, vendas la laborforton mem. Sed en la sklavsistemo, la avantaĝo de laborforto staranta super la la mezumo, aŭ la malavantaĝo de laborforto staranta sub la mezumo, estas por la proprietulo de la sklavo, en la dunglabora sistemo ĝi estas por la laboristo mem, ĉar lia laborforto estas en tiu sistemo vendata de li mem, en la sklavsistemo de tria persono.

Cetere pri la aperformo – „valoro kaj prezo de la laboro" aŭ „labor-salajro" –, kontraste al la esenca rilato, kiu en ĝi „aperas"[9] – la valoro kaj prezo de la laborforto –, direblas la samo kiel pri ĉiuj aperformoj kaj ilia kaŝita fundo. La unuaj reproduktiĝas senpere kaj sponte, kiel kutimaj pensformoj, la alia malkovreblas nur science. La klasika politika ekonomio proksimiĝas preskaŭ tuŝe al la vera stato de la afero, sed sen konscie formuli ĝin. Ĝi ne povas tion, tiom longe kiom ĝi ne demetis sian burĝan haŭton.

9 Do, kiu troviĝas malantaŭ ĝi, aŭ sub ĝi, sub sia aperforma surfaco. -vl

# *DEKOKA ĈAPITRO La tempsalajro*

La salajro alprenas siavice tre diversajn formojn, pri kiuj la ekonomiaj kompendioj neniel informas, ĉar pro sia brutala intereso pri la substanco ili neglektas ĉian forman diferencon. Sed prezentado de ĉiuj tiaj formoj estas la tasko de specifaj verkoj pri la salajro, do ne de tiu ĉi verko. Tamen la du fundamentaj formoj ĉi tie mallonge prezentiĝu.

La vendo de la laborforto okazas ĉiam, kiel oni memoras, por certaj tempaj periodoj. La transformita formo, la aperformo, en kiu la tagvaloro, semajnvaloro ktp de la laborforto rekte prezentiĝas, estas do la „tempsalajro", do tagsalajro ktp.

Unue rimarkendas, ke la en la dekkvina ĉapitro prezentitaj leĝoj pri la ŝanĝoj de la grandoj de la prezo de la laborforto kaj plusvaloro transformiĝas per simpla formŝanĝo en leĝojn de la salajro. Same la diferenco inter la interŝanĝvaloro de la laborforto kaj la kvanto da vivrimedoj, en kiujn tiu valoro transformiĝas, aperas nun kiel diferenco de nominala kaj reala salajro. Ne utilus ripeti en la aperformo tion, kio estas jam prezentita en la esenca formo. Ni limigu nin do al malmultaj punktoj kiuj karakterizas la tempsalajron.

La monsumo[10], kiun la laboristo ricevas por sia taglaboro, semajnlaboro ktp, estas la sumo de lia nominala salajro, aŭ salajro taksita laŭ la valoro. Sed evidentas, ke laŭ la longo de la labortago, do laŭ la laborkvanto tage liverita de li, la sama tagsalajro, semajnsalajro ktp povas prezenti tre diversan prezon de la laboro, do tre diversajn monsumojn por la sama kvanto da laboro.[11] Ĉe la templaboro oni devas do ree distingi inter la ĉioma sumo de la salajro, tagsalajro, semajnsalajro ktp kaj la prezo de la laboro. Kiel nun trovi tiun prezon, do la monvaloron de donita kvanto da laboro? Oni ricevas la mezuman prezon de la laboro per tio ke oni dividas la mezuman tagvaloron de la laborforto per la hornombro de la mezuma labortago. Se la tagvaloro de la laborforto estas ekz-e 3 ŝilingoj, la valorprodukto de ses laborhoroj, kaj se la labortago estas dekduhora, tiam la prezo de unu laborhoro = $^{3\text{ ŝ.}}/_{12}$ = 3 d. La tiel trovita prezo de la laborhoro servas kiel unueca mezuro por la prezo de la laboro.

El tio sekvas, ke la tagsalajro, semajnsalajro ktp povas resti sama,

---

10 La monvaloro mem estas ĉi tie premisita kiel konstanta.

11 „La prezo de la laboro estas la sumo pagata por donita kvanto da laboro." (Sir Edward West: „Price of Corn and Wages of Labour", Londono, 1826, p. 67) West estas la aŭtoro de la skribaĵo epokfara en la historio de la politika ekonomio: *„Essay on the Application of Capital to Land. By a Fellow of Univ. of Oxford"*, Londono, 1815.

kvankam la prezo de la laboro konstante falas. Se ekz-e la kutima labortago estis dek horoj kaj la tagvaloro de la laborforto 3 ŝ., tiam la prezo de la laborhoro estis $3\,^{3}/_{5}$ d.; ĝi falas al 3 d., ekde kiam la labortago longiĝas al 12 horoj, kaj al $2\,^{2}/_{5}$ d., kiam ĝi longiĝas al 15 horoj. La tag- aŭ semajnsalajro restas tamen senŝanĝa. Inverse la tagsalajro aŭ semajnsalajro povas kreski, kvankam la prezo de la laboro restas konstanta aŭ eĉ falas. Se ekz-e la labortago estis dekhora kaj se la tagvaloro de la laborforto estas 3 ŝ., tiam la prezo de unu laborhoro estas $3\,^{3}/_{5}$ d. Se la laboristo pro pli multaj taskoj kaj ĉe senŝanĝa laborprezo laboras 12 horojn, tiam lia tagsalajro kreskas nun al 3 ŝ. $7\,^{1}/_{5}$ d. sen variado de la laborprezo. La sama rezulto povus aperi, se anstataŭ la malintensa grando de la laboro kreskus ĝia intensa grando.[12] Kresko de la nominala tag- aŭ semajn-salajro do akompaneblas de senŝanĝa aŭ falanta prezo de la laboro. La samo direblas pri la enspezo de la laborista familio, kiam la laborkvanto liverata de la familia ĉefo estas pliigita per la laboro de la familianoj. Ekzistas do metodoj por malaltigi la prezon de la laboro, sendependaj de la malaltigo de la nominala tag- aŭ seman-salajro.[13]

Sed ĝenerale sekvas jena leĝo: Se la kvanto de la taga aŭ semajna laboro estas donita, tiam la tag- aŭ semajn-salajro dependas de la prezo de la laboro, kiu siavice varias aŭ kun la valoro de la laborforto aŭ kun la merkataj devioj de ĝia valoro. Se aliflanke la prezo de la laboro estas donita, tiam la tag- aŭ semajn-salajro dependas de la kvanto de la tag- aŭ

12 „La salajroj dependas de la prezo de la laboro kaj de la kvanto de la farita laboro … Altigo de la salajroj ne nepre ekskludas altigon de la prezo de la laboro. Ĉe pli longa okupiĝo kaj pli granda fortostreĉo la salajroj povas konsiderinde kreski, dum la prezo de la laboro povas resti la sama.” (West, l.c., p. 67, 68 kaj 112) Pri la ĉefa demando, nome: kiel determiniĝas la prezo de la laboro?, West eltiriĝas per banalaĵoj.

13 Tion ĝuste sentas la plej fanatika reprezentanto de la industria burĝaro de la 18-a jarcento, la ofte de ni citata aŭtoro de la *„Essay on Trade and Commerce”*, kvankam li prezentas la aferon konfuze: „Estas la kvanto de la laboro kaj ne ĝia prezo” (oni komprenu: „ĝia nominala tag- aŭ semajn-salajro”), „kiu estas determinata de la prezo de la nutraĵoj kaj aliaj vivnecesaj aĵoj: se vi forte malaltigas la prezon de la vivnecesaj aĵoj, tiam vi kompreneble malaltigas proporcie la kvanton da laboro … La fabriksinjoroj scias, ke ekzistas diversaj vojoj altigi aŭ malaltigi la prezon de la laboro, krom la ŝanĝo de ĝia nominala grando.” (l.c., p 48 kaj 61) En siaj *„Three Lectures on the Rate of Wages”*, Londono, 1830, en kiu N. W. Senior uzas la skribaĵon de West sen nomi ĝin, li diras i.a.: „La laboristo interesiĝas ĉefe pri la alteco de sia salajro.” (p. 15) Do la laboristo interesiĝas ĉefe pri tio, kion li ricevas, la nominala alteco de la salajro, ne pri tio, kion li donas, la kvanto de la laboro!

semajn-laboro.

La mezurunuo de la tempsalajro, la prezo de la laborhoroj, estas la kvociento de la tagvaloro de la laborforto, dividita per la hornombro de la kutima labortago. Ni supozu ke tiu estas de 12 horoj, la tagvaloro de la laborforto 3 ŝilingoj, la valorprodukto de ses laborhoroj. La prezo de la laborhoro estas sub tiuj cirkonstancoj 3 d., ĝia valorprodukto 6 d. Se la laboristo estas nun laborigata dum malpli ol 12 horoj tage (aŭ malpli ol dum ses tagoj semajne), ekz-e nur ses aŭ ok horojn, tiam li ricevas, ĉe tiu prezo de la laboro, nur du aŭ $1^1/_2$ ŝilingojn da tagsalajro.[14] Ĉar li devas, laŭ nia premiso, mezume labori dum ses horoj tage, nur por produkti salajron kongruan kun la valoro de sia laborforto, ĉar li laŭ la sama premiso laboras de ĉiu horo nur duonon por si mem, sed duonon por la kapitalisto, tial evidentas, ke li ne povas perlabori la valorprodukton de ses horoj, se li estas laborigata malpli ol dum 12 horoj. Dum ni antaŭe vidis la detruajn sekvojn de la eksceso de laboro, ni malkovras ĉi tie la kaŭzojn de la suferoj, kiuj por la laboristo fontas el lia subokupado.

Se la horsalajro estas fiksata tiel, ke la kapitalisto devigas sin pagi ne tag- aŭ semajn-salajron, sed nur la laborhorojn, dum kiuj li laŭplaĉe laborigas la laboriston, tiam li povas laborigi lin sub la tempo kiu estis origine la bazo por la taksado de la horsalajro aŭ, alivorte, por la mezurunuo por la prezo de la laboro. Ĉar tiu mezurunuo estas determinata de la proporcio $^{\text{tagvaloro de la laborforto}}/_{\text{labortago de donita hornombro}}$, tial ĝi kompreneble perdas ĉian sencon, kiam la labortago ĉesas daŭri dum determinita nombro da horoj. La proporcio inter la pagata kaj nepagata laboro estas rompita. La kapitalisto povas nun elpremi certan kvanton da pluslaboro el la laboristo, sen disponigi al li la labortempon necesan por lia memkonservado. Li povas neniigi ĉian regulecon de la dungo kaj tute laŭ sia komforto, arbitreco kaj momenta intereso alternigi la plej monstran trolaboron kun relativa aŭ tuta senlaboreco. Li povas, sub la preteksto pagi la „normalan prezon de la laboro”, malnormale longigi la labortagon, sen pagi ian ajn kompensaĵon por la laboristo. Pro tio okazis tiu tute racia ribelo (1860) de la londonaj laboristoj okupataj en la konstrubranĉo kontraŭ la provo de la kapitalistoj trudi al ili tian horsalajron. La leĝa limigo de la labortago

14 La efiko de tia malnormala subokupado estas ja malsama ol tiu de ĝenerala leĝa reduktado de la labortago. La unua havas nenion komunan kun la absoluta longo de la labortago kaj povas okazi same ĉe 15-hora kiel ĉe 6-hora labortago. La normala prezo de la laboro estas en la unua kazo kalkulata laŭ tio ke la laboristo laboras mezume 15 horojn, en la dua laŭ tio ke li laboras mezume ses horojn tage. La efiko restas do la sama, se li estas okupata en la unua kazo nur $7^1/_2$, en la alia nur tri horojn.

ĉesigas tiajn skandalojn, kvankam kompreneble ne la subokupadon, kiu fontas el la konkurenco de la maŝinaro, el ŝanĝo de la kvalito de la aplikataj laboristoj, el partaj kaj ĝeneralaj krizoj.

Ĉe kreskanta tag- aŭ semajn-salajro la prezo de la laboro povas resti nominale la sama kaj tamen fali sub sia normala nivelo. Tio okazas ĉiufoje ekde kiam ĉe konstanta prezo de la laboro, respektive de la laborhoro, la labortago estas longigita trans sia kutima daŭro. Se en la frakcio $^{\text{tagvaloro de la laborforto}}/_{\text{labortago}}$ la denominatoro kreskas, tiam la numeratoro[15] kreskas ankoraŭ pli rapide. La valoro de la laborforto, ĉar ĝia elspezo, kreskas kun la kresko de la daŭro de ĝia funkciado kaj en pli rapida proporcio ol tiu. En multaj industribranĉoj, kie tempsalajro regas, sen leĝa limigo de la labortempo, elformiĝis do spontece la kutimo ke la labortago estas konsiderata normala („normala labortago", „taglaboro", „regula labortempo") nur ĝis certa punkto, ekz-e ĝis la fino de la deka horo. Trans tiu limo la labortempo fariĝas supertempo (*overtime*) kaj estas, kun la horo kiel mezurunuo, pli bone pagata (*extra pay*), kvankam ofte en ridinde malgranda proporcio.[16] La normala labortago ekzistas tie kiel frakcio de la vera labortago, kaj tiu lasta daŭras ofte dum la tuta jaro pli longe ol la unua.[17] La kresko de la prezo de la laboro per la longigo de la labortago trans certa normala limo okazas en diversaj britaj industribranĉoj tiel ke la malalta prezo de la laboro dum la tiel nomata normaltempo trudas al la laboristo la pli bone pagatan supertempon, se li entute volas ricevi sufiĉan salajron.[18]

---

15 Memoru, ke frakcio konsistas el: $^{\text{numeratoro}}/_{\text{denominatoro}}$. -vl

16 „La kvoto de pago por supertempo" (en la puntmanufakturo) „estas tiom malgranda, $^{1}/_{2}$ d. ktp hore, ke ĝi staras en plej akra kontrasto kun la grandega malutilo kiun ĝi kaŭzas al la sano kaj al la vivforto de la laboristoj … La tiel gajnita malgranda krompago estas ofte elspezata en kromaj refreŝigaj rimedoj." („*Child. Empl. Comm., II. Rep.*", p. XVI, n. 117)

17 Ekz-e en la tapetpresado antaŭ la ĵusa enkonduko de la fabrikleĝo. „Ni laboris sen paŭzo por manĝoj, tiel ke la taglaboro de $10^{1}/_{2}$ horoj finiĝas je la kvara kaj duono posttagmeze, kaj ĉio posta estas supertempo, kiu ĉesas malofte antaŭ la sesa vespere, tiel ke ni laboras supertempe fakte tra la tuta jaro." (*Mr. Smiths Evidence in „Child. Empl. Comm., I. Rep."*, p. 125)

18 Ekz-e en la skotaj blankigejoj. „En kelkaj partoj de Skotlando tiu industrio" (antaŭ la enkonduko de la fabrikleĝo de 1862) „funkciis laŭ la sistemo de supertempo, t.e. dek horoj estis konsiderataj normala labortago. Por tiuj la laboristo ricevis 1 ŝ. 2 d. Sed ĉiutage aldoniĝis supertempo de tri aŭ kvar horoj, por kiu oni pagis 3 d. hore. Sekvo de tiu sistemo: Viro, kiu laboris nur dum la normaltempo, povis gajni nur 8 ŝ. da semajna salajro. Sen supertempo

Leĝa limigo de la labortago ĉesigas tiun ĵongladon.[19]

Estas ĝenerale konata fakto, ke, ju pli longas la labortago en industribranĉo, des pli malaltas la salajro.[20] La fabrikinspektisto A. Redgrave ilustras tion per kompara listo de la dudekjara periodo de 1839-1859, laŭ kiu la salajro en la fabrikoj submetitaj al la dekhorleĝo altiĝis, dum ĝi malaltiĝis en la fabrikoj, kie oni laboris 14 ĝis 15 horojn tage.[21]

El la leĝo: „Ĉe donita prezo de la laboro la tag- aŭ semajn-salajro dependas de la kvanto de la liverita laboro" sekvas unue, ke, ju pli malaltas la prezo de la laboro, des pli devas grandi la laborkvanto aŭ des pli devas longi la labortago, por ke la laboristo certigu al si eĉ nesufiĉan mezuman salajron. La malalteco de la laborprezo efikas ĉi tie kiel sprono por longigi la labortempon.[22]

---

la salajro ne sufiĉis." („*Reports of Insp. of Fact., 30th April 1863"*, p. 10) La „krompago por superlaboro estas tento, al kiu la laboristoj ne povas rezisti". („*Rep. of Insp. of Fact., 30th April 1848"*, p. 5) La librobindejo en la urbocentro de Londono uzas tre multajn junajn knabinojn de la 14-a ĝis la 15-a jaraĝo, sub la lerneja kontrakto, kiu preskribas certajn laborhorojn. Tamen ili laboras en la finsemajno de ĉiu monato ĝis la deka, dekunua, eĉ ĝis noktomeze kaj ĝis la unua nokte, kune kun la pli aĝaj laboristoj, en tre miksita kompanio. „La majstroj logas ilin per kromsalajro kaj mono por bona noktmanĝo", kiun ili manĝas en najbaraj gastejoj. La diboĉo kaj malĉasteco, kiu tiel produktiĝas inter tiuj „junaj senmortaj animoj" („*Child. Empl. Comm., V. Rep."*, p. 44, n. 191) estas kompensata per tio, ke ili bindas interalie ankaŭ multajn bilbliojn kaj edifajn librojn.

19 Vd „*Reports of Insp. of Fact., 30th April 1863"*, l.c. Kun tute prava kritiko de la faktaj kondiĉoj la londonaj laboristoj de la konstrubranĉo deklaris dum sia granda striko kaj lokaŭto de 1860, ke ili volas akcepti la horsalajron nur sub du kondiĉoj: 1. ke kun la prezo de la laborhoro estu fiksita norma labortago de respektive naŭ kaj dek horoj kaj la prezo de la horo de la dekhora labortago estu pli granda ol por tiu de la naŭhora labortago; 2. ke ĉiu horo super la norma tago estu relative pli alte pagata kiel supertempo.

20 „Estas krome sufiĉe notinda fakto, ke tie, kie la labortempo estas ĝenerale longa, la salajroj estas malaltaj." („*Rep. of Insp. of Fact., 31st Oct. 1863"*, p. 9) „La laboro, kiu enspezigas mizeran salajron, estas plej ofte ekscese longa." („*Public Health, Sixth Rep. 1863"*, p. 15)

21 „*Reports of Insp. of Fact., 30th April 1860"*, p. 31, 32.

22 La permanaj najlofaristoj en Anglio devas ekz-e pro la malalta laborprezo labori dum 15 horoj tage, por enspezi la plej mizeran semajnsalajron. „Estas multaj, multaj horoj de la tago, kaj dum tiu tuta tempo li devas peze laboregi, por enspezi proksimume 11 d. aŭ unu ŝilingon, kaj de tio estas $2^{1}/_{2}$ ĝis 3 d. deprenataj pro eluziĝo de la laboriloj, hejtado, ferdefalaĵo." („*Child. Empl.*

Sed inverse la longigo de la labortempo produktas siavice malaltigon de la laborprezo kaj per tio de la tag- kaj semajn-salajro.

La determinado de la laborprezo per

$$\text{tagvaloro de la laborforto} / \text{labortago de donita hornombro}$$

rezultigas, ke nura longigo de la labortago malaltigas la laborprezon, se ne okazas kompensaĵo. Sed la samaj cirkonstancoj, kiuj kapabligas la kapitaliston longigi la labortagon por longa tempo, unue kapabligas lin kaj fine devigas lin malaltigi la laborprezon ankaŭ nominale, ĝis kiam la ĉiomprezo de la pliigita hornombro malaltiĝas, do la tag- aŭ semajn-salajro. Ĉi tie sufiĉas indiki du cirkonstancojn. Se viro faras la laboron de $1^1/_2$ aŭ de du viroj, tiam la provizo je laboro kreskas, eĉ se la provizo je laborfortoj en la merkato restas senŝanĝa. La tiel kreata konkurenco inter la laboristoj kapabligas la kapitaliston malaltigi la prezon de la laboro, dum la falanta prezo de la laboro kapabligas lin, inverse ankoraŭ pli longigi la labortempon.[23] Sed baldaŭ tiu dispono pri nenormala – t.e. la socian mezuman nivelon superanta – kvanto da nepagata laboro fariĝas rimedo de konkurenco inter la kapitalistoj mem. Parto de la varprezo konsistas el la prezo de la laboro. La ne pagita parto de la laborprezo ne devas nepre aperi en la varprezo. Oni povas donaci ĝin al la aĉetanto de la varo. Tio estas la unua paŝo, al kiu la konkurenco premas la kapitaliston. La dua paŝo, al kiu ĝi devigas lin, estas, ankaŭ ekskludi el la vendoprezo de la varo almenaŭ parton de la nenormala plusvaloro produktita per la longigo de la labortago. Tiumaniere formiĝas nenormale malalta vendo-prezo de la varo, unue okaze kaj iom post iom fiksiĝante, kiu fariĝas de nun konstanta bazo de mizera salajro ĉe ekscesa labortempo. Ĉi tie sufiĉas simpla aludo, ĉar ĉi tie ne temas pri analizo de la konkurenco. Ni donu tamen por momento la parolon al la kapitalisto mem:

> „En Birminghamo la konkurenco inter la majstroj estas tiom granda, ke kelkaj el ni estas devigataj fari kiel dungisto ion, kion li alie hontus fari; kaj tamen oni ne faras pli da mono, sed nur la publiko havas la avantaĝon de tio."[24]

---

*Comm., III. Rep."*, p. 136, n. 671) La virinoj gajnas dum la sama labortempo semajnsalajron de nur 5 ŝ. (l.c., p. 137, n. 674)

23 Se fabriklaboristo ekz-e rifuzas labori dum la kutima longa hornombro, „li tre rapide anstataŭiĝus per iu, kiu pretas labori kiom ajn longe, kaj li tiel fariĝus senlabora". (*„Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1848", Evidence, p. 39, n. 58)* „Se viro faras la laboron de du … ĝenerale la profitkvoto kreskas …, ĉar tiu aldona provizo je laboro malaltigis ties prezon." (Senior, l.c., p. 15)

24 *„Child. Empl. Comm., III. Rep.", Evidence, p. 66, n. 22.*

Ni memoru la du specojn de londonaj bakistoj, el kiuj la unua vendas panon plenpreze, la alia sub ĝia normala prezo. La „plenprezuloj” denuncas siajn konkurencantojn antaŭ la parlamenta enketkomisiono:

> „Ili ekzistas nur per tio, ke ili unue trompas la publikon” (per falsado de la varo) „kaj due elpremas 18 laborhorojn el siaj uloj por la salajro de dekduhora laboro … La nepagita laboro de la laboristoj estas la rimedo, per kiu oni faras la konkurenc-batalon … La konkurenco inter la bakistoj estas la kaŭzo de la malfacilo forigi la noktlaboron. Subpreza vendisto, kiu vendas sian panon sub la kostprezo, kiu ŝanĝiĝas kun la farunprezo, povas fari tion, ĉar li elpremas pli da laboro el siaj uloj. Se mi elpremas nur 12 horojn da laboro el miaj uloj, sed mia najbaro 18 aŭ 20, tiam li devas bati min en la vendoprezo. Se la laboristoj povus insisti pri pago por supertempo, tiam tiu fimanovro baldaŭ ĉesos … Granda nombro da dungitoj de la subprezuloj estas fremduloj, junuloj kaj aliaj, kiuj estas devigataj akcepti preskaŭ ĉian ajn salajron kiun ili povas ricevi.”[25]

Tiu veplendo estas interesa ankaŭ ĉar ĝi montras, ke nur la ŝajno de la produktadkondiĉoj respeguliĝas en la kapitalista cerbo. La kapitalisto ne scias, ke la normala prezo de la laboro inkludas certan kvanton da nepagata laboro kaj ke ĝuste tiu nepagata laboro estas la fonto de lia profito. La kategorio de la pluslabortempo tute ne ekzistas por li, ĉar ĝi estas inkludita en la normala labortago, kiun li kredas pagi per la tagsalajro. Sed ja ekzistas por li la supertempo, la plilongigo de la labortago trans la limo kongrua kun la kutima prezo de la laboro. Kontraŭ lia subpreze vendanta konkurenculo li insistas eĉ pri krompago por tiu supertempo. Li ree ne scias, ke tiu krompago inkludas same nepagatan laboron kiel la prezo de la kutima laborhoro. Ekz-e se la prezo de horo de dekduhora labortago estas 3 d., la valorprodukto de duona laborhoro, dum la prezo de la supertempa laborhoro 4 d., la valorprodukto de $^{2}/_{3}$ laborhoro. En la unua kazo la kapitalisto alproprigas al si el unu laborhoro la duonon, en la alia trionon sen pago.

25 „*Reports etc. relative to the Grievances complained of by the journeymen bakers”*, Londono, 1862, p. LII kaj ib., *Evidence*, n. 479, 359, 27. Tamen ankaŭ la plenprezuloj, kiel antaŭe menciite kaj kion koncedas ilia porparolanto Bennet mem, igas siajn homojn „komenci la laboron je la 11-a vespere aŭ pli frue kaj longigas ĝin ofte ĝis la 7-a de la sekva vespero”. (l.c., p. 22)

# DEKNAŬA ĈAPITRO La pecsalajro

La pecsalajro estas nenio alia ol transformita formo de la tempsalajro, kiel la tempsalajro estas la transformita formo de la valoro aŭ prezo de la laborforto.

Ĉe la pecsalajro oni havas unuavide la impreson, kvazaŭ la uzvaloro vendata de la laboristo ne estus la funkcio de lia laborforto, vivanta laboro, sed jam en la produkto konkretigita laboro, kaj kvazaŭ la prezo de tiu laboro ne estus determinata, kiel ĉe la tempsalajro, de la frakcinombro

$^{\text{tagvaloro de la laborforto}}/_{\text{labortago de donita hornombro}}$ , sed de la produktadkapablo de la produktanto.[26]

Unue, la optimismo, kiu kredas je tiu ŝajno, devus jam forte ŝanceliĝi pro la fakto ke ambaŭ formoj de la salajro ekzistas samtempe en la samaj industribranĉoj. Ekz-e

> „La kompostistoj de Londono laboras ĝenerale laŭ pecsalajro, dum tempsalajro estas ĉe ili la escepto. Inverse okazas ĉe la kompostistoj en la provincoj, kie la tempsalajro estas la regulo kaj la pecsalajro la escepto. La ŝipĉarpentistoj en la londona haveno estas pagataj laŭ pecsalajro, en ĉiuj aliaj anglaj havenoj laŭ tempsalajro."[27]

En la samaj londonaj selfarejoj oni ofte pagas por la sama laboro al la francoj pecsalajron kaj al la angloj tempsalajron. En la veraj fabrikoj, kie pecsalajro regas ĝenerale, la unuopaj laborfunkcioj pro teĥnikaj kialoj eskapas tiun mezuradon kaj oni pagas do laŭ tempsalajro.[28] Ĉiel ajn, estas

---

26 „La sistemo de peclaboro karakterizas epokon en la historio de la laboristo; ĝi staras meze inter la pozicio de la simpla tagsalajrulo, kiu dependas de la volo de la kapitalisto, kaj la kooperacia metiisto, kiu esperigas en ne tro malproksima estonteco kunigi en sia persono la metiiston kaj la kapitaliston. Peclaboristoj estas efektive iliaj propraj majstroj, ankaŭ se ili laboras por la kapitalo de la entreprenisto." (John Watts: *„Trade Societies and Strikes, Machinary and Cooperative Societies"*, Manĉestro, 1865, p. 52, 53) Mi citas tiun verketon, ĉar ĝi estas vera kloako de ĉiuj delonge putrintaj, apologiaj banalaĵoj. La sama s-ro Watts kondutis antaŭe laŭ ovenismo kaj publikigis en 1842 alian verketon: *„Facts and Fictions of Political Economy"*, en kiu li deklaras i.a., ke proprieto estas rabo. Nu, antaŭ longa tempo.

27 T. J. Dunning: *„Trade's Unions and Strikes"*, Londono, 1860, p. 22.

28 Kiel la samtempa apudeco de tiuj du formoj de salajro favoras la fabrikistan trompadon: „Fabriko dungas 400 homojn, el kiuj la duono laboras laŭ pecsalajro kaj havas rektan intereson labori pli longe. La aliaj 200 estas pagataj laŭtage, laboras same longe kiel la aliaj, sed ne ricevas monon por superhoroj … La laboro de tiuj 200 homoj dum duona horo tage egalas la

klare ke la formdiferenco en la pago de la salajro ŝanĝas neniom ĝian esencon, kvankam unu formo povas esti pli favora al la evoluo de la kapitalisma produktado ol la alia.

Ni supozu ke la kutima labortago estas 12 horoj, el kiuj ses estas pagataj kaj ses ne pagataj. Ĝia valorprodukto estu 6 ŝilingoj, tiu de laborhoro do 6 d. Ni supozu krome ke laŭsperte montriĝas, ke laboristo, kiu laboras kun mezuma grado de intenso kaj de lerteco, uzas efektive nur la socie necesan labortempon por produktado de artiklo, do liveras 24 pecojn, ĉu diskretajn, ĉu mezureblajn partojn de kontinua produkto, en 12 horoj. Tiel la valoro de tiuj 24 pecoj, post depreno de la kapitalparto entenata en ili, 6 ŝilingoj, kaj la valoro de la unuopa peco 3 d. La laboristo ricevas por ĉiu peco po $1^1/_2$ d. kaj gajnas tiel en 12 horoj 3 ŝilingojn. Same kiel ĉe la tempsalajro estas egale ĉu oni supozas ke la laboristo laboras 6 horojn por si kaj 6 horojn por la kapitalisto, aŭ de ĉiu horo la duonon por si kaj la alian duonon por la kapitalisto, tiel ankaŭ ĉi tie, ĉu oni diras ke ĉiu unuopa peco estas duone pagata kaj duone ne pagata, aŭ ke la prezo de 12 pecoj anstataŭas nur la valoron de la laborforto, dum en la 12 aliaj enkorpiĝas la plusvaloro.

La formo de la pecsalajro estas same malracia kiel tiu de la tempsalajro. Dum ekz-e du pecoj da varo, post depreno de la valoro de la en ĝi entenataj produktadrimedoj, kiel produkto de unu laborhoro valoras 6 d., la laboristo ricevas por ili prezon de 3 d. La pecsalajro efektive ne rekte esprimas valorrilaton. Ne temas pri tio, mezuri la valoron de la pecoj per la en ĝi enkorpigita labortempo, sed inverse, mezuri la de la laboristo elspezitan laboron per la nombro da pecoj produktitaj de li. Ĉe la tempsalajro la laboro mezuriĝas ĉe ties rekta tempodaŭro, ĉe la pecsalajro ĉe la kvanto da produktoj, en kiuj laboro dum difinita tempo estas densigita.[29] La prezo de la labortempo mem estas fine determinata per la ekvacio: valoro de la taglaboro = tagvaloro de la laborforto. La pecsalajro estas do

laboron de unu persono dum 50 horoj aŭ $^5/_6$ de la semajna laborprodukto de unu persono kaj prezentas palpeblan gajnon por la entreprenisto." („Reports of Insp. of Fact., 31st October 1860", p. 9) „Superhoroj daŭre antaŭregas en vere konsiderinda grado; kaj en la plej multaj kazoj kun la sekureco kontraŭ malkovro kaj puno, kiun la leĝo mem disponas. Mi montris en multaj antaŭaj raportoj … kiom da maljustaĵo estas farata al ĉiuj laboristoj, kiuj ne ricevas laŭpecan salajron, sed semajnsalajron." (Leonard Horner en *„Reports of Insp. of Fact., 30th April 1859"*, p. 8, 9)

29 „La salajro mezureblas dumaniere; aŭ ĉe la daŭro de la laboro aŭ ĉe ties produkto" (*„Abrégé élémentaire des principes de l'Écon. Pol."*, Parizo, 1796, p. 32) Aŭtoro de tiu anonima skribaĵo: G. Garnier.

nur modifita formo de la tempsalajro.

Ni rigardu nun iom pli proksime la karakterizajn trajtojn de la pecsalajro.

La kvalito de la laboro estas ĉi tie kontrolata de la produkto mem, kiu devas havi la mezuman kvaliton, se la pecprezo estu plene pagota. La pecsalajro fariĝas tiurilate la plej fruktodona fonto de salajro-deprenoj kaj de kapitalista trompado.

Ĝi donas al la kapitalistoj tute precizan mezuron de la labor-intenso. Nur labortempo, kiu enkorpiĝas en antaŭe laŭsperte fiksita varkvanto, estas konsiderata socie necesa labortempo kaj estas pagata kiel tia. En la iom grandaj tajlorejoj de Londono certa peco da laboro, ekz-e veŝto ktp, nomiĝas do horo, duonhoro ktp, kun la horo je 6 d. El la praktiko estas konate, kiom grandas la mezuma produkto de horo. Ĉe novaj modoj, riparadoj ktp estiĝas disputoj inter dungisto kaj laboristo, ĉu certa laborpeco egalas al unu horo ktp, ĝis kiam ankaŭ tie la sperto decidas. Simile en la londonaj meblo-lignaĵejoj ktp. Se la laboristo ne posedas la mezuman kapablon, se li do ne povas liveri certan minimumon de taglaboro, oni maldungas lin.[30]

Ĉar kvalito kaj intenso de la laboro estas ĉi tie kontrolataj per la formo de la salajro mem, ĝi superfluigas grandan parton de kontrolado de la laboro. Ĝi fariĝas do la bazo de la antaŭe priskribita domlaboro kiel ankaŭ de hierarĥie strukturite sistemo de ekspluatado kaj de subpremado. Tiu lasta posedas du bazajn formojn. La pecsalajro unuflanke plifaciligas la interŝovadon de parazitoj inter kapitaliston kaj dunglaboriston, subluadon de la laboro (*subletting of labour*). La profito de la interuloj venas ekskluzive el la diferenco de la laborprezo, kiun la kapitalisto pagas, kaj la parto de tiu prezo, kiun ili reale donas al la laboristo.[31] Tiu sistemo nomiĝas en Anglio karakterize la „*sweating-system*” (elŝvitsistemo). Aliflanke la pecsalajro ebligas al la kapitalisto kontrakti kun la ĉeflaboristo – en la

30 „Oni transdonas al li” (al la ŝpinisto) „certan pezon da kotono, kaj li devas por tio en difinita tempo liveri certan pezon da ŝpinita kotono aŭ da fadeno de difinita grado de fajneco kaj ricevas por ĉiu tia funto sian pagon. Se la kvalito de la laboro estas mankhava, li estas punata; se la kvanto estas malpli ol la antaŭe fiksita kiel minimumo por difinita tempo, oni maldungas lin kaj dungas pli diligentan laboriston.” (Ure, l.c., p. 316, 317)

31 „Se la laborprodukto trairas multajn manojn, kiuj ĉiu ricevas parton de la profito, dum nur la lasta paro da manoj faras la laboron, tiam okazas ke la pago, kiu fine atingas la laboristinon, estas mizere malproporcia.” („*Child. Empl. Comm. II. Rep.”, p. LXX, n. 424*)

manufakturo kun la grupĉefo, en la minejoj kun la elrompisto de karbo ktp – pri tiom da pago por ĉiu peco, je prezo por kiu la ĉeflaboristo mem transprenas la varbadon kaj pagon de siaj helplaboristoj. La ekspluatado de la laboristoj fare de la kapitalo realiĝas tie per la ekspluatado de la laboristo per la laboristo.[32]

Ĉe la pecsalajra sistemo estas kompreneble la persona intereso de la laboristo, kiom eble plej intense streĉi sian laborforton, kio faciligas al la kapitalisto altigon de la normala grado de intenso.[33]

Estas ankaŭ la persona intereso de la laboristo plilongigi la labortagon, ĉar per tio lia tag- aŭ semajn-salajro kreskas.[34] Per tio okazas la reago jam priskribita ĉe la tempsalajro, sen konsideri ke la plilongigo de la labortago, eĉ ĉe senŝanĝa pecsalajro, inkludas per si mem malaltigon de la laborprezo.

---

32 Eĉ la apologia Watts rimarkigas: „Estus granda plibonigo de la pecsalajra sistemo, se ĉiuj laborantaj pri peco da laboro estus partoprenantoj en la kontrakto, ĉiu laŭ siaj kapabloj, anstataŭ ke unu viro havas la intereson igi siajn kamaradojn laboregi por lia propra avantaĝo.” (l.c., p. 53) Pri la fiaĵoj de tiu sistemo kp *„Child. Emp. Comm. Rep. III”*, p. 66, n. 22; p. 11, n. 124; p. XI, n. 13, 53, 59 ktp.

33 Kvankam tiu rezulto fariĝas per si mem, oni ofte uzas rimedojn por estigi ĝin artefarite. En Londono ekz-e, en la maŝinkonstruado, oni uzas tradicie la trukon „ke la kapitalisto elektas viron de supera korpa forto kaj lerteco kiel ĉefon de grupo da laboristoj. Li pagas al li kvaronjare aŭ en aliaj tempospacoj kromsalajron kun la interkonsento ke li faru ĉion eblan por instigi siajn kunlaborantojn, kiuj ricevas nur la ordinaran salajron, al plej fervora konkurado kun li … Sen plia komento tio klarigas la plendon de la kapitalistoj pri la „paralizado de la aktiveco aŭ de supera lerteco kaj laborforto (*stinting the action, superior skill and working power*) per la sindikatoj (*Trade’s Unions*)”. (Dunning, l.c., p. 22, 23) Ĉar la aŭtoro estas mem laboristo kaj sekretario de unu el la sindikatoj, tio povus esti konsiderata kiel troigo. Sed oni vidu ekz-e en la „plej respektinda” agronomia enciklopedio de J. Ch. Morton, la artikolon „*Labourer*” [laboristo], kie tiu metodo estas rekomendata al la farmistoj kiel imitinda.

34 „Ĉiuj, kiuj estas pagataj pecsalajre … havas la avantaĝon el la transiro de la leĝaj limoj de la laboro. Tiu preteco fari kromhorojn observeblas ĉefe ĉe la virinoj, kiuj estas dungitaj kiel teksistoj kaj bobenistoj.” („*Rep. of Insp. of Fact., 30th April 1858”, p. 9*) „Tiu pecsalajra sistemo, tiom avantaĝa por la kapitalisto … rekte tendencas instigi la junan potfariston al granda superlaboro, en la kvar aŭ kvin jaroj, dum kiuj li estas pagata pecon post peco, sed je malalta prezo. Tiu estas unu el la grandaj kaŭzoj al kiuj atribueblas la korpa degeneriĝo de la potistoj.” („*Child. Empl. Comm. I. Rep.”, p. XIII*)

Ĉe la tempsalajro regas kun malmultaj esceptoj sama salajro por la samaj funkcioj, dum ĉe la pecsalajro la prezo de la labortempo estas ja mezurata per certa kvanto da produktoj, sed la tag- aŭ semajn-salajro ŝanĝiĝas kun la individua diferenco de la laboristoj, el kiuj iu liveras nur la minimumon da produktoj en donita tempo, la alia la mezumon, la tria pli ol la mezumon. En la realaj enspezoj aperas tie do grandaj diferencoj laŭ la diversaj lerteco, forto, energio, persistemo de la individuaj laboristoj.[35] Tio ŝanĝas kompreneble neniom en la ĝenerala rilato inter kapitalo kaj dunglaboro. Unue la individuaj diferencoj kompensiĝas por la tuta laborejo, tiel ke ĝi liveras en certa labortempo la mezuman produkton kaj ke la pagata ĉiomsalajro estas la mezuma salajro de la industribranĉo. Due la proporcio inter salajro kaj plusvaloro restas senŝanĝa, ĉar al la individua salajro de la unuopa laboristo proporcias la kvanto da pluslaboro liverita de li. Sed la pli granda agmarĝeno, kiun la pecsalajro donas al la individueco, tendencas unuflanke al evoluado de la individueco kaj per tio de la libereco-sento, memstareco kaj memkontrolo de la laboristoj, aliflanke de la konkurenco inter ili kaj de unu kontraŭ la alian. Ĝi havas do la tendencon, per la altigo de la individuaj salajroj super la mezuman nivelon malaltigi tiun nivelon mem. Sed kie certa pecsalajro de longa tempo tradicie fiksiĝis kaj ĝia malaltigo trafis do sur apartan malfacilon, la majstroj esceptokaze uzis ankaŭ perfortan transformadon en tempsalajron. Kontraŭ tio okazis ekz-e en 1860 granda striko inter la rubandteksistoj de *Coventry*.[36] La pecsalajro estas fine ĉefa

35 „Kie la laboro en kiu ajn industrio estas pagata laŭ la nombro da pecoj, po tiom por ĉiu peco … la salajroj povas en sia alteco esti tre grave malsamaj … Sed por la tagsalajro ekzistas ĝenerale unueca kvoto … agnoskata de la entreprenisto kaj de la laboristo kiel norma salajro por la mezuma laboristo en tiu laboro.” (Dunning, l.c., p. 17)

36 „La laboro de metiaj submastroj reguliĝas laŭ la tago aŭ laŭ la peco … La majstroj scias proksimume, kiom da unuoj la laboristoj povas tage fari en ĉiu metio, kaj pagas ilin do ofte en la proporcio de iliaj faritaj unuoj; tiel tiuj submajstroj laboras tiom, kiom ili povas, en sia propra intereso, sen plia kontrolado.” (Cantillon: „*Essai sur la Nature du Commerce en Général”*, Amsterdamo, eld. 1756, p. 185 kaj 202. La unua eldono aperis 1755) Cantillon, el kiu Quesnay, Sir James Steuart kaj A. Smith abunde ĉerpis, do prezentas jam ĉi tie la pecsalajron kiel nur modifitan formon de la tempsalajro. La franca eldono de Cantillon anonciĝas en la titolo kiel traduko el la angla, sed la angla eldono: „*The Analysis of Trade, Commerce* ktp, by Philip Cantillon, late of the City of London, Merchant”, aperis ne nur pli poste (en 1759), sed montriĝas en sia enhavo kiel posta prilaboraĵo. Ekz-e en la franca eldono, Hume ankoraŭ ne estas menciata, dum inverse en la angla Petty preskaŭ ne plu aperas. La angla eldono estas teorie malpli grava, sed entenas

apogo de la antaŭe priskribita horsistemo.[37]

La ĝisnuna prezentado montras, ke la pecsalajro estas la formo de salajro kiu plej taŭgas por la kapitalisma produktadmaniero. Kvankam tute ne nova – ĝi aperas oficiale apud la tempsalajro interalie en la francaj kaj anglaj laborstatutoj de la dekkvara jarcento –, ĝi gajnas pli grandan terenon nur dum la vera manufakturperiodo. En la furorperiodo de la granda industrio, nome de 1797 ĝis 1815, ĝi servas kiel levilo por longigi la labortempon kaj malaltigi la salajron. Oni trovas tre gravan materialon pri la moviĝo de la salajro dum tiu periodo en la blulibroj: *„Report and Evidence from the Select Committee on Petitions respecting the Corn Laws”* (parlamenta sesio 1813-1814) kaj *„Reports from the Lord's Committee, on the state of the Growth, Commerce, and Consumption of Grain, and all Laws relating thereto”* (sesio 1814-1815). Oni trovas tie la dokumentitan pruvon por la konstanta malaltigo de la laborprezo ekde la komenco de la milito kontraŭ la jakobenoj. En la teksado ekzemple la pecsalajro fariĝis tiom malalta, ke spite al la tre longigita labortago la tagsalajro estis nun pli malalta ol antaŭe.

> „La reala enspezo de la kotonteksisto estas multe malpli alta ol antaŭe: lia supereco super la ordinara laboristo, kiu iam estis tre granda, preskaŭ tute malaperis. Fakte la diferenco inter la salajroj de lerta kaj de ordinara laboro estas nun multe pli malgrava ol dum ia ajn antaŭa periodo.”[38]

Kvankam per la pecsalajro altiĝis la intenso kaj la daŭro de la laboro, ĝi neniel utilis al la kampara proletaro, kiel videblas el la sekva tekstero, citita el pledo favore al la anglaj kamparaj nobeloj kaj farmistoj:

> „La ege plej granda parto de la kampkulturaj laboroj estas farata de homoj, kiuj estas dungitaj por la tago aŭ por peclaboro. Ilia semajna salajro estas proksimume 12 ŝilingoj; kaj kvankam oni povas supozi, ke viro ĉe pecsalajro,

---

multon kiu koncernas specife anglan komercon, lingotkomercon ktp, kio mankas en la franca teksto. La vortoj en la titolo de la angla eldono, laŭ kiu la verko estas *„Taken chiefly from the Manuscript of a very ingenious Gentleman deceased, and adapted* ktp” <„Prenita ĉefe el la manuskripto de tre sprita, forpasinta nobelo kaj adaptita ktp”>, ŝajnas do pli ol nura fikcio, tiam tre moda.

37 „Kiom ofte ni vidis, ke en certaj laborejoj multe pli da laboristoj estis dungitaj ol vere necesaj por la laboro? Ofte oni dungas laboristojn atendante laboron ankoraŭ ne certan, kelkfoje eĉ nur imagitan: ĉar oni pagas popece, oni diras al si, ke oni riskas neniom, ĉar la tuta perdita tempo estas je la ŝarĝo de la neokupatoj.” (H. Gregoir: *„Les Typographes devant le Tribunal Correctionnel de Bruxelles”*, Bruselo, 1865, p. 9)

38 *„Remarks on the Commercial Policy of Great Britain”*, Londono, 1815, p. 48.

> sub la pli granda laborsprono, gajnas 1 ŝilingon aŭ eble 2 ŝilingojn pli ol ĉe la semajnsalajro, oni tamen trovas, ĉe taksado de liaj tutaj enspezoj, ke lia perdo de dungo, dum la jaro, kompensas tiun kroman gajnon … Oni trovas krome, ke la salajroj de tiuj viroj havas certan proporcion al la prezo de la necesaj vivrimedoj, tiel ke viro kun du infanoj kapablas vivteni sian familion sen subteno fare de pastrejo."[39]

Malthus tiam rimarkigis koncerne la faktojn publikigitajn de la parlamento:

> „Mi konfesas, ke mi vidas kun malplezuro la grandan etendiĝon de la praktiko de pecsalajro. Vere intensa laboro dum 12 aŭ 14 horoj tage, por iom longaj periodoj, estas tro por homa estaĵo."[40]

En la laborejoj submetitaj al la fabrikleĝo, la pecsalajro fariĝas ĝenerala regulo, ĉar la kapitalo povas tie ankoraŭ pli intense etendi la labortagon.[41]

Kun la ŝanĝiĝanta laborproduktivo la sama produktkvanto prezentas ŝanĝiĝantan labortempon. Do ankaŭ la pecsalajro ŝanĝiĝas, ĉar ĝi estas la preza esprimo de certa labortempo. En nia supra ekzemplo oni produktis en 12 horoj 24 pecojn, dum la valorprodukto de la 12 horoj estis 6 ŝilingoj, la tagvaloro de la laborforto 3 ŝ., la prezo de la laborhoro 3 d. kaj la salajro por unu peco $1^1/_2$ d. En unu peco ensuĉiĝis duona laborhoro. Se la sama labortago liveras nun, ekzemple pro duobliĝinta produktivo de la laboro, 48 pecojn anstantaû 24, kaj se ĉiaj aliaj cirkonstancoj restas senŝanĝaj, tiam la pecsalajro falas de $1^1/_2$ d. al $^3/_4$ d., ĉar ĉiu peco prezentas nun jam nur kvaronon anstataŭ duonan laborhoron. 24 x $1^1/_2$ d. = 3 ŝ. kaj same 48 x $^3/_4$ d. = 3 ŝ. Per aliaj vortoj: La pecsalajro malaltiĝas en la sama proporcio, laŭ kiu la nombro da pecoj produktataj en la sama tempo kreskas[42], do laŭ kiu la labortempo aplikata al la sama peco malpliiĝas.

39 *„A Defence of the Landowners and Farmers of Great Britain"*, Londono, 1814, p. 4, 5.

40 Malthus: *„Inquiry into the Nature etc. of Rent"*, Londono, 1815, [p. 49, noto].

41 „La laboristoj je pecsalajro estas verŝajne kvar kvinonoj de ĉiuj laboristoj en la fabrikoj." (*„Reports of Insp. of Fact. for 30th April 1858"*, p. 9)

42 „La produktadforto de lia ŝpinmaŝino estas precize mezurata kaj la pago por la laboro farita per ĝi malpliiĝas *kun*, kvankam ne *proporcie al* la kresko de ĝia produktadforto." (Ure, l.c., p. 317) La lastan apologian formulon Ure mem nuligas. Li koncedas, ke ekz-e longigo de la ŝpinmaŝino kaŭzas kroman laboron. La laboro do ne malpliiĝas en la mezuro laŭ kiu ĝia produktivo kreskas. Krome: „Per tiu longigo la produktadforto de la maŝino kreskas je kvinono. Sekve al tio, la ŝpinisto jam ne estas pagata je la sama kvoto por farita laboro kiel antaŭe, sed ĉar tiu kvoto ne estas malaltigata en proporcio de kvinono, la plibonigo altigas lian mongajnon por ĉiu donita nombro da labor-

Tiu ŝanĝo de la pecsalajro, kvankam pure nominala, kaŭzas konstantajn batalojn inter kapitalisto kaj laboristo. Ili okazas aŭ, ĉar la kapitalisto uzas la pretekston por vere malaltigi la prezon de la laboro, aŭ ĉar la kreskinta produktadforto de la laboro estas akompanata de kreskanta intenso de la laboro. Aŭ ĉar la laboristo prenas la ŝajnon de la pecsalajro kiel realon, kvazaŭ oni pagus al li lian produkton kaj ne lian laborforton, kaj pro tio ribelas kontraŭ malpliigo de la salajro, kiu ne kongruas kun la malaltiĝo de la vendoprezo de la varo.

> „La laboristoj zorgeme kontrolas la prezon de la krudmaterialo kaj la prezon de la fabrikitaj varoj kaj tiel kapablas precize pritaksi la profitojn de siaj mastroj."[43]

Tian pretendon <3-a kaj 4-a eldono: eldiron> la kapitalo prave refutas kiel krudan eraron pri la naturo de la dunglaboro.[44] Ĝi kriegas kontraŭ tiaj provoj imposti la progresojn de la industrio kaj aplombe deklaras ke la produktivo de la laboro <4-a eldono: laboristo> tute ne koncernas la laboriston.[45]

---

horoj" – sed, sed – „la antaŭa konstato postulas certan modifon … la ŝpinisto devas el sia kroma duona ŝilingo pagi iom por kromaj junaj helpantoj, kio estas krome akompanata de forigo de parto de plenkreskuloj." (l.c., p. 321) – kio tute ne havas tendencon kreksigi la salajron.

43 H. Fawcett: *„The Economic Position of the British Labourer"*, Kambriĝo kaj Londono, 1865, p. 178.

44 En la londona *Standard* de la 26-a de oktobro 1861 troviĝas raporto pri proceso de la firmao John Bright kaj K-o antaŭ la pacjuĝistoj, kun la celo „persekuti la agentojn de la sindikato de la tapiŝteksistoj pro timigo. La partneroj de Bright enkondukis novan maŝinon, kiu devis produkti 240 metrojn (*yards*) da tapiŝo en la tempo kaj per la laboro (!), kiuj antaŭe necesis por la produktado de 160 metroj. La laboristoj havis nenian rajton partopreni en la profitoj, kiuj estis faritaj per la kapitalinvesto de iliaj entreprenistoj por meĥanikaj plibonigoj. Pro tio la s-roj Bright proponis malaltigi la salajron de po $1^1/_2$ d. por ĉiu metro al 1 d., per kio la enspezoj de la laboristoj por la sama laboro restis samaj kiel antaŭe. Sed tio estis nominala malaltigo, pri kiu la laboristoj, kiel oni asertis, ne estis antaŭe informitaj."

45 „Sindikatoj, en sia avido konservi la salajron, provas partopreni en la profito de plibonigita maŝinaro!" (Kia hororo!) „… ili postulas pli altan salajron, ĉar la laboro estas malpliigita … per aliaj vortoj, ili strebas imposti industriajn plibonigojn." (*„On Combination of Trades"*, *New Edit.*, Londono, 1834, p. 42)

# DUDEKA ĈAPITRO Naciaj diferencoj de la salajroj

En la dekkvina ĉapitro ni pritraktis la diversajn kombiniĝojn kiuj povas kaŭzi ŝanĝon en la absoluta aŭ relativa (do kompare kun la plusvaloro) valorgrando de la laborforto, dum aliflanke la kvanto de vivrimedoj, en kiu la prezo de la laborforto realiĝas, povis moviĝi diverse aŭ sendepende de la ŝanĝiĝo de tiu prezo.[46] Kiel jam dirite, per la simpla traduko de la valoro, respektive prezo de la laborforto, en la pli malesoteran formon de salajro, ĉiuj tiuj leĝoj transformiĝas en leĝojn de moviĝo de la salajro. Kio ene de tiu moviĝo povas aperi kiel ŝanĝiĝanta kombiniĝo, tio povas por diversaj landoj aperi kiel samtempa diverseco de naciaj salajroj. Ĉe la komparo de naciaj salajroj oni devas konsideri do ĉiujn elementojn kiuj determinas la ŝanĝon de la valorgrando de la laborforto, prezon kaj amplekson de la nature kaj historie evoluintaj unuaj vivbezonoj, edukado-kostojn de la laboristo, rolon de la virin- kaj infan-laboro, produktivon de la laboro, ties malintensan kaj intensan grandon. Eĉ la plej supraĵa komparo postulas unue redukti la mezuman tagsalajron por la sama branĉo en diversaj landoj al same grandaj labortagoj. Post tiaj tagsalajroj reduktitaj al same grandaj labortagoj, la tempsalajroj siavice tradukendas al pecsalajro, ĉar nur tiu estas mezurilo por la produktivo kaj por la laborintenso.

En ĉiu lando estas certa meza laborintenso, sub kiu la laboro ĉe produktado de varo konsumas pli ol la socie necesan tempon kaj do ne estas konsiderata laboro de normala kvalito. Nur intensogrado super la nacia mezumo ŝanĝas, en donita lando, la mezuron de la valoro per la nura daŭro de la labortempo. Alie okazas en la mondmerkato, kies integrantaj partoj estas la unuopaj landoj. La meza intenso de la laboro ŝanĝiĝas de lando al lando; ĝi estas ie pli granda, tie pli malgranda. Tiuj naciaj mezumoj konsistigas do skalon, kies mezurunuo estas la mezuma unuo de la universala laboro. Kompare kun la malpli intensa laboro, la pli intensa nacia laboro produktas do en la sama tempo pli da valoro, kiu esprimiĝas en pli da mono.

Sed la valorleĝo estas en sia internacia apliko ankoraŭ pli modifata per tio, ke en la mondmerkato la pli produktiva nacia laboro kalkuliĝas ankaŭ kiel pli intensa, ekde kiam la pli produktiva nacio ne estas de la konkurenco devigata malaltigi la vendoprenzon de sia varo al ties valoro.

En la mezuro, kiel la kapitalisma produktado estas evoluinta, en la

46 „Ne ĝustas diri, ke la salajroj” (ĉi tie temas pri ilia prezo) „kreskis, ĉar per ili eblas aĉeti pli da malpli kosta artiklo.” (David Buchanan en sia eldono de A. Smith: „*Wealth* ktp”, 1814, vol. I, p. 417, noto)

sama mezuro ankaŭ la nacia intenso kaj produktivo de la laboro leviĝas super la internacia nivelo.[47] La diversaj samspecaj varkvantoj, kiuj estas en diversaj landoj produktataj en sama labortempo, havas do malsamajn internaciajn valorojn, kiuj esprimiĝas en diversaj prezoj, t.e. en diversaj monsumoj ĉiu laŭ la internaciaj valoroj. La relativa valoro de la mono estos do malpli granda ĉe la nacio kun pli evoluinta kapitalisma produktadmaniero ol ĉe tiu kun malpli evoluinta. El tio sekvas do, ke la nominala salajro, la ekvivalento de la laborforto esprimita en mono, estas ankaŭ pli alta ĉe la unua nacio ol ĉe la dua; tio tute ne signifas, ke tio validas ankaŭ por la reala salajro, t.e. por la vivrimedoj disponigitaj al la laboristo.

Sed ankaŭ sendepende de tiu relativa malsameco de la monvaloro en diversaj landoj, oni trovos ofte, ke la taga, semajna ktp salajro ĉe la unua nacio estas pli alta ol ĉe la dua, dum la relativa laborprezo, t.e. la laborprezo en proporcio al la plusvaloro kaj al la valoro de la produkto, ĉe la dua nacio staras pli alte ol ĉe la unua.[48]

J. W. Cowell, membro de la fabrikkomisiono de 1833, konkludis post zorgema esplorado de la ŝpinindustrio, ke

> „en Anglio la salajroj estas fakte por la fabrikisto pli malaltaj ol sur la kontinento, kvankam ili povas esti pli altaj por la laboristo” (Ure, p. 314)

La angla fabrikinspektisto Alexander Redgrave pruvas en la fabrikraporto de la 31-a de oktobro 1866 per kompara statistiko kun la kontinentaj ŝtatoj, ke malgraŭ pli malalta salajro kaj multe pli longa labortempo la

---

47 Aliloke ni esploros, kiuj cirkonstancoj, koncerne la produktivon, povas modifi tiun leĝon por unuopaj produktadbranĉoj.

48 James Anderson rimarkas polemike kontraŭ A. Smith: „Utilas same rimarki, ke, kvankam la prezo de la laboro en malriĉaj landoj – kie la kampaj produktoj, kaj speciale greno, estas malmultekostaj – estas ŝajne kutime pli malalta, ĝi estas tie tamen plej ofte reale pli alta ol en aliaj landoj. Ĉar ne la salajro, kiun laboristo ricevas tage, prezentas la realan prezon de la laboro, kvankam ĝi estas ĝia ŝajna prezo. La reala prezo estas tio, kio certa kvanto da liverita laboro efektive kostas al la entreprenisto; kaj sub tiu vidpunkto, laboro estas en preskaŭ ĉiuj riĉaj landoj malpli kosta ol en pli malriĉaj, kvankam la prezo de la greno kaj de aliaj vivrimedoj estas en tiuj lastaj multe pli malalta ol en la unuaj … Laboro en tagsalajro estas multe pli malalta en Skotlando ol en Anglio … Laboro en popeca salajro estas ĝenerale pli malmultekosta en Anglio” (James Anderson: *„Observations on the means of exciting a spirit of National Industry etc.”*, Edinburgo, 1777, p. 350, 351) – Inverse, la malalteco de la salajro produktas siavice pli altan koston de la laboro. „Laboro estas pli multekosta en Irlando ol en Anglio … ĉar la salajroj estas tiom pli malaltaj.” (N-ro 2074 en *„Royal Commission on Railways, Minute”*, 1867)

kontinenta laboro, proporcie al la produkto, estas pli kosta ol la angla. Angla direktoro (*manager*) en kotonfabriko en Oldenburgo deklaras, ke tie la labortempo daŭras de la 5:30 matene ĝis la 8-a vespere, inkluzive de sabate, kaj ke la tieaj laboristoj, kiam ili estas kontrolataj de anglaj kontrolistoj, dum tiu tempo liveras ne tiom da produktoj ol angloj en 10 horoj, sed sub germanaj laborkontrolistoj ankoraŭ multe malpli. La salajro estas multe pli malalta ol en Anglio, kelkfoje je 50 elcentoj, sed la nombro da manoj proporcie al la maŝinaro estas multe pli granda, en kelkaj departementoj en proporcio de 5 : 3. S-ro Redgrave donas tre precizajn detalojn pri la rusaj kotonfabrikoj. La datumojn li ricevis de tie ankoraŭ antaŭ nelonge laboranta angla fabrikdirektoro. Sur tiu rusa grundo, tiom fekunda je ĉiaj fiaĵoj, do ankaŭ la malnovaj hororaĵoj el la infanperiodo de la anglaj fabrikoj plene floras. La direktoroj estas kompreneble angloj, ĉar la indiĝena rusa kapitalisto ne taŭgas por la fabrikafero. Malgraŭ ĉia trolaboro, daŭra tag- kaj nokt-laboro kaj plej honta subpagado de la laboristoj, la rusa fabrikaĵo vegetas nur per malpermeso de la eksterlanda. – Mi donas fine ankoraŭ komparon de s-ro Redgrave pri la mezuma nombro da ŝpiniloj po fabriko kaj po ŝpinisto en la diversaj landoj de Eŭropo. S-ro Redgrave rimarikas mem, ke li kolektis tiujn nombrojn antaŭ kelkaj jaroj kaj ke post tiu tempo la grando de la fabrikoj kaj la nombro da ŝpiniloj po laboristo en Anglio kreskis. Sed li supozas proporcie same grandan progreson en la nombritaj kontinentaj landoj, tiel ke la indikoj, laŭ li, konservis sian komparan valoron.

*Mezuma nombro da ŝpiniloj po fabriko*

| | |
|---|---|
| En Anglio | 12.600 |
| En Svislando | 8.000 |
| En Aŭstrio | 7.000 |
| En Saksujo | 4.500 |
| En Belgio | 4.000 |
| En Francio | 1.500 |
| En Prusio | 1.500 |

*Mezuma nombro da ŝpiniloj po kapo*

| | |
|---|---|
| En Francio | unu persono por 14 ŝpiniloj |
| En Ruslando | unu persono por 28 ŝpiniloj |
| En Prusio | unu persono por 37 ŝpiniloj |
| En Bavario | unu persono por 46 ŝpiniloj |
| En Aŭstrio | unu persono por 49 ŝpiniloj |
| En Belgio | unu persono por 50 ŝpiniloj |
| En Saksio | unu persono por 50 ŝpiniloj |
| En la pli malgrandaj germanaj ŝtatoj | unu persono por 55 ŝpiniloj |
| En Svislando | unu persono por 55 ŝpiniloj |
| En Britio | unu persono por 74 ŝpiniloj |

„Tiu komparo”, diras s-ro Redgrave, „estas malfavora al Britio, krom pro aliaj kialoj, ankaŭ ĉar tie ekzistas tre granda nombro da fabrikoj, en kiuj la maŝinteksado estas ligita kun la ŝpinado, dum la kalkulo ne deprenas personon por la teksiloj. Male al tio, la eksterlandaj fabrikoj estas plej ofte nuraj ŝpinejoj. Se ni povus kompari samon kun samo, mi povus nombri multajn kotonŝpinejojn en mia distrikto, en kiu ŝpinmaŝinoj kun 2.200 ŝpiniloj estas kontrolataj de unu sola viro (*minder*) kaj de du helpantinoj kaj kie fabrikiĝas tage 220 funtoj da fadeno, 400 (anglaj) mejloj da longeco.” (*„Reports of Insp. of Fact., 31st Oct. 1866”*, p. 31-37 plurl.)

Oni scias, ke en orienta Eŭropo same kiel en Azio anglaj kompanioj transprenis la konstruadon de fervojoj kaj dungas apud indiĝenajn ankaŭ anglajn laboristojn. Devigataj de praktika neceso konsideri la naciajn diferencojn de laborintenso, tio ne malutilis al ili. Ilia sperto instruas, ke, eĉ se la alteco de la salajro respondas pli aŭ malpli al la mezuma laborintenso, la relativa laborprezo (en proporcio al la produkto) moviĝas ĝenerale en la kontraŭa senco.

En „Provaĵo pri la kvoto de salajro”[49], unu el siaj plej fruaj ekonomikaj verkoj, H. Carey provas pruvi, ke la diversaj naciaj salajroj estas inter si

49 *„Essay on the Rate of Wages: with an Examination of the Causes of the Differences in the Conditions of the Labouring Population throughout the World”*, Filadelfio, 1835.

en rekta proporcio kiel la gradoj de produktivo de la naciaj labortagoj, por konkludi el tiu internacia proporcio, ke la salajro entute kreskas kaj falas kiel la produktivo de la laboro. Nia tuta analizo de la produktado de plusvaloro pruvas la absurdecon de tiu konkludo; se Carey pruvus almenaŭ sian premison, anstataŭ, laŭ sia kutimo, senkritike kaj supraĵe pelmele miksi supraĵe kunigitan statistikan materialon. Sed la plej bona estas, ke li ne asertas, ke la afero kondutas reale tiel, kiel ĝi devus konduti laŭ la teorio. La ŝtata interveno nome falsis la naturan ekonomian rilaton. Oni devas do kalkuli la naciajn salajrojn tiel, kvazaŭ ilia parto, kiun la ŝtato ricevas en formo de impostoj, estus ricevita de la laboristo mem. Ĉu s-ro Carey ne prefere pripensu, ĉu tiuj „ŝtataj kostoj” estas ankaŭ „naturaj fruktoj” de la kapitalisma evoluo? La argumentado estas laŭ la nivelo de la homo, kiu unue deklaris la kapitalismajn produktadkondiĉojn eternaj leĝoj de la naturo kaj de la racio, kies libera harmonia ludo estas ĝenata nur de la ŝtata interveno, por poste malkovri, ke la diableca influo de Anglio sur la mondmerkaton, influo kiu, ŝajne, ne fontas el la naturleĝoj de la kapitalisma produktado, necesigas la ŝtatan intervenon, nome la protekton de tiuj naturaj kaj raciaj leĝoj fare de la ŝtato, alivorte la protektsistemon. Li malkovris krome, ke la teoremoj de Ricardo ktp, en kiuj ekzitantaj sociaj kontraŭecoj kaj kontraŭdiroj formuliĝas, ne estas la ideala produkto de la reala ekonomia moviĝo, sed ke inverse la realaj kontraŭecoj de la kapitalisma produktado en Anglio kaj aliloke estas la rezulto de la rikarda ktp teorio! Li malkovris fine, ke lastatempe estas la komerco, kiu neniigas la ennaskitajn belecojn kaj harmoniojn de la kapitalisma produktadmaniero. Ankoraŭ paŝon pli, kaj li eble malkovros, ke la sola miso ĉe la kapitalisma produktado estas la kapitalo mem. Nur homo de tiom horora senkritikeco kaj de tia klereco de falsa enhavo meritus, malgraŭ sia protektisma herezado, fariĝi la sekreta fonto de la harmonia saĝo de iu Bastiat kaj de ĉiuj liberkomercaj optimistoj de la nuntempo.

# SEPA SEKCIO – La akumuladprocezo de la kapitalo

La transformado de monsumo en produktadrimedojn kaj laborforton estas la unua moviĝo, kiun la valorkvanto faras, kiu devas funkcii kiel kapitalo. Ĝi okazas en la merkato, en la sfero de cirkulado. La dua fazo de la moviĝo, la produktadprocezo, estas finita, ekde kiam la produktadrimedoj estas transformitaj en varon, kies valoro superas la valoron de ĝiaj konsistigaj partoj, do entenas la origine antaŭpagitan kapitalon kaj plusvaloron. Tiuj varoj siavice enĵetendas en la sferon de cirkulado. Ili estas vendendaj, por realigi ilian valoron en monon, tiun monon denove transformi en kapitalon, kaj tiel ĉiam denove. Tiu rondiro, kiu trairas ĉiam la samajn sinsekvajn fazojn, konsistigas la cirkuladon de la kapitalo.

La unua premiso de la akumulado estas, ke la kapitalisto sukcesis vendi siajn varojn kaj retransformi la ṕlej grandan parton de la tiel ricevita mono en kapitalon. En la sekvo ni supozu, ke la kapitalo trairas sian cirkuladprocezon normale. La pli detala analizo de tiu procezo apartenas al la Dua libro.

La kapitalisto, kiu produktas la plusvaloron, t.e. elpumpas nepagatan laboron rekte el la laboristoj kaj fiksas ĝin en varojn, estas ja la unua alpropriganto, sed tute ne la lasta proprietulo de tiu plusvaloro. Li devas poste dividi ĝin kun kapitalistoj, kiuj plenumas aliajn funkciojn en la tutaĵo de la socia produktado, kun la grundproprietulo ktp. La plusvaloro fendiĝas do en diversajn partojn. Ĝiaj frakcioj iras al diversaj kategorioj de personoj kaj ricevas diversajn formojn sendependajn unu de la alia, ekz-e profiton, interezon, komercan gajnon, grundrenton ktp. Tiuj transformitaj formoj de la plusvaloro trakteblas nur en la Tria libro.

Ni supozu do ĉi tie unuflanke, ke la kapitalisto, kiu produktas la varon, vendas ĝin laŭ ĝia valoro, kaj ne restu plu ĉe lia reveno al la varmerkato, nek ĉe la novaj formoj, kiujn la kapitalo en la cirkuladsfero alprenas, nek ĉe la en ĝi envolvitaj konkretaj kondiĉoj de reproduktado. Aliflanke ni konsideru la kapitalisman produktanton kiel proprietulon de la tuta plusvaloro aŭ, se vi preferas, kiel reprezentanton de ĉiuj liaj partoprenantoj en la predo. Ni rigardas do unue la akumuladon abstrakte, do kiel nuran elementon de la rekta produktadprocezo.

Cetere, en la mezuro laŭ kiu okazas akumulado, la kapitalisto sukcesas la vendon de la produktita varo kaj la retransformadon de la mono ricevita

el tiu vendo en kapitalon. Krome: La divido de la plusvaloro en plurajn partojn ŝanĝas neniel ĝian naturon, nek la necesajn kondiĉojn, en kiuj ĝi fariĝas elemento de akumulado. Kian ajn proporcion de la plusvaloro la kapitalisma produktanto retenas por si mem aŭ cedas al aliaj, li alproprigas ĝin ĉiam unuamane. Do, tio, kion ni supozas ĉe nia prezentado de la akumulado, estas supozata ĉe ĝia reala okazado. Aliflanke la disfendo de la plusvaloro kaj la peranta movado de la cirkulado malklarigas la simplan bazan formon de la akumuladprocezo. Ĝia pura analizo postulas do provizoran malatenton de ĉiuj fenomenoj kiuj kaŝas la internan ludon de ĝia meĥanismo.

# *DUDEKUNUA ĈAPITRO – Simpla reproduktado*

Kia ajn estas la socia formo de la produktadprocezo, ĝi devas esti kontinua aŭ, kio estas la samo, periode ĉiam denove trairi la samajn stadiojn. Same kiel socio ne povas ĉesi konsumi, ĝi ne povas ĉesi produkti. Rigardata en konstanta kunteniĝo kaj en la konstanta fluo de sia renoviĝo, ĉiu socia produktadprocezo estas do samtempe reproduktadprocezo.

La kondiĉoj de la produktado estas samtempe la kondiĉoj de la reproduktado. Nenia socio povas daŭre produkti, t.e. reprodukti, sen konstante retransformi parton de siaj produktoj en produktadrimedojn aŭ elementojn de nova produktado. Sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj ĝi povas reprodukti aŭ konservi sian riĉaĵon en la sama skalo nur per tio ke ĝi anstataŭigas la produktadrimedojn, konsumitajn ekz-e dum jaro, do laborrimedojn, krudmaterialojn kaj helpmaterialojn konkrete per sama kvanto de novaj ekzempleroj, kiu estas de la jara produktkvanto disigita kaj denove enkorpigita en la produktadprocezon. Certa kvanto de la jara produkto apartenas do al la produktado. Dekomence destinita al la produktanta konsumado, ĝi ekzistas grandparte en naturaj formoj, kiuj per si mem ekskludas la individuan konsumadon.

Se la produktado havas kapitalisman formon, tiam ankaŭ la reproduktado. Kiel en la kapitalisma produktadmaniero la laborprocezo aperas nur kiel rimedo por la plivaloriga procezeo, tiel la reproduktado nur kiel rimedo reprodukti la antaŭpagitan valoron kiel kapitalon, do kiel sin plivalorigantan valoron. La ekonomia karaktermasko de la kapitalisto fiksiĝas nur per tio al homo, ĉar lia mono funkcias konstante kiel kapitalo. Se ekz-e la antaŭpagita monsumo de 100 sterlingaj pundoj transformiĝas

ĉi-jare en kapitalon kaj produktas plusvaloron de 20 pundoj, tiam ĝi devas en la venonta jaro ktp ripeti la saman operacion. Kiel perioda kreskaĵo de la kapitalvaloro, aŭ perioda frukto de la procezanta kapitalo, la plusvaloro ricevas la formon de revenuo (enspezo, *revenue*) fontanta el la kapitalo.[1]

Se tiu enspezo servas al la kapitalisto nur kiel konsumfonduso aŭ se ĝi estas same periode konsumita kiel gajnita, tiam okazas, sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj, simpla reproduktado. Kvankam tiu estas nur simpla samskala ripetado de la produktadprocezo , tiu simpla ripetado aŭ daŭro donas al la procezo certajn novajn karakterojn aŭ pli ĝuste dissolvas la ŝajnkarakterojn de ĝia nur unuopa okazo.

Ni konsideru unue tiun parton de la kapitalo, kiu estas pagata kiel salajro, aŭ la varian kapitalon.[2]

La produktadprocezo estas enkondukata per la aĉeto de la laborforto por certa tempo, kaj tiu enkonduko renoviĝas konstante, ekde kiam la vendotempo de la laboro ĉesas kaj per tio certa produktadperiodo, semajno, monato ktp finiĝas. Sed la laboristo estas pagata nur post kiam lia laborforto efikis kaj realigis sian propran valoron kaj ankaŭ la plusvaloron en varoj. Li produktis do la plusvaloron, kiun ni provizore konsideras nur kiel konsumfonduson de la kapitalisto, same kiel la fonduson de sia propra pago, la varian kapitalon, antaŭ ol tiu refluas al li en formo de la salajro, kaj li estas dungata nur tiom longe, kiom li konstante reproduktas ĝin. Pro tio la formulo – menciita en la deksesa ĉapitro sub II. – de la ekonomikistoj, kiu prezentas la salajron kiel parton de la produkto mem.[3] Ĝi estas parto de la produkto konstante reproduktata de la laboristo mem, kiu konstante refluas al li en la formo de salajro. La kapitalisto pagas al li la varvaloron tamen en mono. Sed tiu mono estas nur la transformita formo de la laborprodukto. Dum la laboristo transformas parton de la

1 „La riĉuloj, kiuj konsumas la laborproduktojn de aliuloj, ricevas ilin nur per interŝanĝaj agoj (varaĉetoj). Ili ŝajnas do elmetitaj al baldaŭa elĉerpiĝo de siaj rezervaj fondusoj … Sed en la socia ordo la riĉeco ricevis la forton reproduktiĝi per fremda laboro … La riĉaĵo, kiel la laboro kaj per la laboro, liveras jaran frukton, kiu ĉiujare neniigeblas, sen ke la riĉulo fariĝu pli malriĉa. Tiu frukto estas la revenuo (*revenue*,enspezo) kiu fontas el la kapitalo.” (Sismondi, *„Nouv. Princ. d’Écon. Pol.”*, vol. I, p. 81, 82)

2 Tiu frazo el la franca eldono ne aperas en la germana. -vl

3 „Salajroj kiel ankaŭ profitoj estas ambaŭ konsiderendaj kiel parto de preta produkto.” (Ramsay, l.c., p. 142) „La parto de la produkto, kiun la laboristo ricevas en la formo de salajro.” (J. Mill: *„Elements etc.”*, tradukita de Parisot, Parizo, 1823, p. 33, 34)

produktadrimedoj en produkton, parto de lia pli frua produkto retrotransformiĝas en monon. Tiu estas lia laboro de la pasinta semajno aŭ de la lasta duonjaro, per kiu lia laboro de hodiaŭ aŭ de la venonta jaro estas pagata. La iluzio, kiun la monformo kreas, malaperas tuj, ekde kiam oni konsideras anstataŭ la unuopan kapitaliston kaj la unuopan laboriston la kapitalistan klason kaj la laboristan klason. La kapitalista klaso donas al la laborista klaso konstante en monformo atribuaĵojn je parto de la lasta produktitaj kaj de la unua alproprigita produkto. Tiujn atribuaĵojn la laboristo redonas al la kapitalista klaso same konstante kaj per tio elprenas la parton de sia propra produkto, kiu estas atribuita al li. La varformo de la produkto kaj la monformo de la varo maskas tiun transakcion.

La varia kapitalo[4] estas do nur aparta historia aperformo de la fonduso de vivrimedoj aŭ de la laborfonduso, kiun la laboristo bezonas por sia memkonservado kaj reproduktado kaj kiun li devas mem produkti kaj reprodukti en ĉiaj sistemoj de socia produktado. La laborfonduso fluas al li konstante en formo de pagrimedoj de lia laboro nur ĉar lia propra produkto konstante malproksimiĝas de li en la formo de kapitalo. Sed tiu aperformo de la laborfonduso ŝanĝas neniel ke la kapitalisto antaŭpagas lian propran konkretigitan laboron.[5]

Ni rigardu servutan terkulturiston. Li laboras per siaj propraj produktadrimedoj sur sia propra kampo ekz-e tri tagojn semajne. Dum la tri aliaj semajntagoj li faras servutlaboron ĉe la sinjora bieno. Li reproduktas sian propran laborfonduson konstante, kaj tiu neniam ricevas por li la formon de pagrimedoj antaŭpagitaj de iu tria por lia laboro. Aliflanke ankaŭ lia nepagata servutlaboro neniam ricevas la formon de libervola kaj pagata laboro. Se morgaŭ la biensinjoro alproprigas al si mem la kampon, la tirbestojn, la semojn, mallonge la produktadrimedojn de la servutulo, tiam tiu devas nun vendi sian laborforton al la feŭda sinjoro. Sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj li laboros tiam kiel antaŭe 6 tagojn en la semajno, 3 tagojn por si mem, 3 por la eksa feŭda sinjoro, kiu transformiĝis en dungiston. Nun kiel antaŭe li konsumas la produktadrimedojn kiel produktadrimedojn kaj transigas ilian valoron al la produkto. Nun kiel antaŭe certa parto de la produkto eniros la reproduktadon. Sed kiel la servutlaboro

4 La varia kapitalo estas konsiderata ĉi tie nur kiel pagfonduso de la salajruloj. Oni scias ke en la realo ĝi fariĝas varia nur ekde la momento kiam la laborforto kiun ĝi aĉetas funkcias jam en la procezo de produktado. *(fr. eld.)*

5 „Se kapitalo estas uzata por antaŭpagi al la laboristo lian salajron, tiam li neniom aldonas al la fonduso por konservado de la laboro.” (Cazenove en noto pri sia eld. de Malthus: *„Definitions in Polit. Econ.”*, Londono, 1853, p. 22)

alprenas la formon de dunglaboro, tiel la laborfonduso, nun kiel antaŭe produktata kaj reproduktata de la servutulo, alprenas la formon de kapitalo antaŭpagata de la feŭda sinjoro. La burĝa ekonomikisto, kies limigita cerbo ne povas disigi la aperformon disde tio, kio en ĝi aperas, fermas la okulojn antaŭ la fakto, ke eĉ nuntempe la laborfonduso aperas sur la planedo nur esceptokaze en la formo de kapitalo.[6]

Tamen la varia kapitalo perdas sian sencon de valoro antaŭpagata de la kapitalisto el lia propra fonduso[7], nur ekde kiam ni konsideras la kapitalisman produktadprocezon en la konstanta fluo de ĝia renoviĝo. Sed ĝi devas ja ie kaj iam komenci. El nia ĝisnuna vidpunkto estas do verŝajne ke la kapitalisto iam per ia origina akumulado, sendependa de nepagita fremda laboro, fariĝis monposedanto kaj do povis aliri la merkaton kiel aĉetanto de laborforto. Provizore ni akceptu tian solvon de la problemo, kun la rezervo ke ni rigardos ĝin pli proksime en la ĉapitro pri la tiel nomata origina akumulado.[8] Tamen la nura kontinueco de la kapitalisma produktadprocezo, aŭ la simpla reproduktado, kaŭzas ankoraŭ aliajn strangajn ŝanĝojn, kiuj tuŝas ne nur la varian kapitalparton, sed la tutan kapitalon.

Se la plusvaloro produktata periode, ekz-e jare, per kapitalo de 1.000 pundoj, estas 200 pundoj kaj se tiu plusvaloro estas jare konsumata, tiam klaras, ke post kvinjara ripetado de tiu sama procezo la sumo de la konsumita plusvaloro = 5 x 200 aŭ egala al la origine antaŭpagita kapitalvaloro de 1.000 pundoj. Se la jara plusvaloro estus konsumita nur parte, ekz-e nur duone, tiam la samo rezultus post dekjara ripetado de la produktadprocezo, ĉar 10 x 100 = 1.000. Ĝenerale: La antaŭpagita kapitalvaloro, dividita per la jare konsumita plusvaloro, rezultigas la jarnombron aŭ la nombron da reproduktadperiodoj, post kiuj la origine antaŭpagita kapitalo estas konsumita de la kapitalisto kaj do malaperinta. La imago de la kapitalisto, ke li konsumas la produkton de la fremda nepagita laboro, la plusvaloron, kaj konservas la originan kapitalvaloron, povas absolute neniom ŝanĝi tiun fakton. Post paso de certa nombro da jaroj la kapital-

6 „La ekzistadrimedoj de la laboristoj estas ankoraŭ ne sur kvarono de la Tero antaŭpagataj al la laboristoj fare de kapitalistoj.” (Richard Jones: *„Tetbook of Lectures on the Polit. Economy of Nations”*, *Hertford*, 1852, p. 36)

7 „Kvankam la manufakturlaboristo ricevas sian salajron de la majstro, li en la realo kaŭzas al li neniajn kostojn, ĉar la valoro de la salajro kune kun profito estas kutime restarigita en la plialtigita valoro de la objekto, al kiu lia laboro estis aplikita.” (A. Smith, l.c., *Book II, ch. III, p. 355*)

8 *Tiu ĉi lasta frazo el la franca eld.* -vl

valoro alproprigita de li egalas la sumon de la plusvaloro alproprigita dum la samaj jaroj sen ekvivalento, kaj la valorsumo konsumita de li egalas al la origina kapitalvaloro. Tamen li konservas en sia mano kapitalon, kies grando ne ŝanĝiĝis, de kiu parto – konstruaĵoj, maŝinoj ktp – jam ekzistis, kiam li lanĉis sian aferon. Sed ĉi tie temas pri la valoro de la kapitalo kaj ne pri ties materiaj partoj. Se iu forkonsumas sian tutan posedaĵon per tio ke li faras ŝuldojn en la valoro de tiu posedaĵo, tiam lia tuta havaĵo reprezentas nur la sumon de liaj ŝuldoj. Kaj same, se la kapitalisto forkonsumis la ekvivalenton de sia antaŭpagita kapitalo, la valoro de tiu kapitalo reprezentas jam nur la sumon de la plusvaloro senpage alproprigita de li. Nenia valoratomo de lia malnova kapitalo plu ekzistas.

Tute sendepende de ĉia akumulado, do la nura kontinueco de la produktadprocezo, aŭ la simpla reproduktado, transformas post pli aŭ malpli longa periodo ĉian kapitalon nepre en akumulitan kapitalon aŭ kapitaligitan plusvaloron. Eĉ se ĝi estis, ĉe sia eniro en la produktadprocezon, persone perlaborita proprieto de sia aplikanto, pli aŭ malpli frue ĝi fariĝas valoro aŭ materiiĝo, ĉu en monformo aŭ alie, sen ekvivalento alproprigita, de nepagita fremda laboro.

Ni vidis en la kvara ĉapitro: Por transformi monon en kapitalon, ne sufiĉas la ekzisto de varproduktado <4-a eldono: valorproduktado> kaj varcirkulado. Unue devis, ĉi tie posedanto de valoro aŭ mono, tie posedanto de la valorestiga substanco; ĉi tie posedanto de produktad- kaj viv-rimedoj, tie posedanto de nenio ol laborforto, alpaŝi unu la alian kiel aĉetanto kaj vendanto. Disigo de la laborprodukto disde la laboro mem, de la objektivaj laborkondiĉoj disde la subjektiva laborforto, estis do la efektive donita ekirpunkto de la kapitalisma produktadprocezo.

Sed kio estis komence nur la ekirpunkto, estas per la nura kontinueco de la procezo, de la simpla reproduktado, ĉiam denove produktata kaj eternigata kiel propra rezulto de la kapitalisma produktado. Unuflanke la produktadprocezo transformas konstante la materian riĉaĵon en kapitalon, en plivalorigajn kaj ĝuajn rimedojn por la kapitalisto. Aliflanke la laboristo elvenas el la procezo ĉiam tia, kia li eniris ĝin – persona fonto de la riĉaĵo, sed senigita je ĉiaj rimedoj realigi tiun riĉaĵon por si. Ĉar antaŭ lia eniro en la procezon lia propra laboro estis fremdigita al li, alproprigita de la kapitalisto kaj enkorpigita al la kapitalo, ĝi konkretiĝas dum la procezo konstante en fremdan produkton. Ĉar la produktadprocezo estas samtempe la procezo de konsumado de la laborforto fare de la kapitalisto, la produkto de la laboristo transformiĝas konstante ne nur en varon, sed en kapitalon, en valoron kiu elsuĉas la valorestigan forton, en vivrimedon,

kiu aĉetas personojn, produktadrimedojn, kiuj aplikas la produktanton.[9] La laboristo mem produktas do konstante la objektivan riĉaĵon kiel kapitalon, potencon al li fremdan, lin dominantan kaj ekspluatantan, kaj la kapitalisto produktas same konstante la laborforton kiel subjektivan riĉfonton, disigitan de ĝiaj propraj konkretigaj kaj realigaj rimedoj, abstraktan, en la nura korpeco de la laboristo ekzistantan, mallonge la laboriston kiel dunglaboriston.[10] Tiu konstanta reproduktado aŭ eternigo de la laboristo estas la nepra kondiĉo de la kapitalisma produktado.

La konsumado de la laboristo estas duspeca. En la produktado mem li konsumas per sia laboro produktadrimedojn kaj transformas ilin en produktojn de pli alta valoro ol tiu de la antaŭpagita kapitalo. Tio estas lia produktiva konsumado. Ĝi estas samtempe konsumado de lia laborforto fare de la kapitalisto, kiu aĉetis ĝin. Aliflanke la laboristo transformas la monon, pagitan al li per la aĉeto de lia laborforto, en vivrimedojn: tio estas lia individua konsumado. La produktiva kaj la individua konsumadoj de la laboristo estas do totale malsamaj. En la unua li agas kiel mova forto de la kapitalo kaj apartenas al la kapitalisto; en la dua li apartenas al si mem kaj plenumas vivfunkciojn ekster la produktadprocezo. La rezulto de la unua estas la vivo de la kapitalisto, tiu de la alia estas la vivo de la laboristo mem.

Ĉe la rigardo de la „labortago" ktp montriĝis okaze, ke la laboristo estas ofte devigata fari sian individuan konsumadon nura incidento de la produktadprocezo. Tiukaze li konsumas vivrimedojn por vivteni sian laborforton, kiel oni donas al la vapormaŝino karbon kaj akvon, al la rado oleon. Liaj konsumrimedoj estas tiam nur konsumrimedoj de produktadrimedo, lia individua konsumado rekte produktiva konsumado. Sed tio aperas kiel nur okaza misuzo de la kapitalisma produktadprocezo.[11]

---

9 „Jen aparte stranga eco de la produktiva konsumado. Kio estas produktive konsumata, estas kapitalo, kaj ĝi fariĝas kapitalo per la konsumado." (James Mill, l.c., p. 242) J. Mill tamen ne malkovris la spuron de tiu „aparte stranga eco".

10 „Efektive veras, ke la unua enkonduko de manufakturo laborigas multajn brakojn, sed tiuj restas malriĉaj, kaj la daŭrigo de la manufakturo produktas ankoraŭ multajn da ili." (*„Reasons for a limited Exportation of Wool"*, Londono, 1677, p. 19) „La farmisto asertas nun kontraŭ ĉia racio, ke li vivtenas la malriĉulojn. En la realo ili estas konservataj en la mizero." (*„Reasons for the late Increase of the Poor Rates: or a comparative view of the prices of labour and provisions"*, Londono, 1777, p. 31.

La afero aspektas alia, ekde kiam ni rigardas ne la unuopan kapitaliston kaj la unuopan laboriston, sed la kapitalistan klason kaj la laboristan klason, ne la unuopan produktadprocezon de la varo, sed la kapitalisman produktadprocezon en ĝia fluo kaj en ĝia socia amplekso. – Se la kapitalisto transformas parton de sia kapitalo en laborforton, li plivalorigas per tio sian tutan kapitalon. Li frapas du muŝon per unu bato. Li profitas ne nur tion, kion li ricevas de la laboristo, sed ankaŭ tion, kion li donas al li. La kapitalo elspezita interŝanĝe kontraŭ laborforto estas transformata en vivrimedojn, kies konsumado servas por reprodukti muskolojn, nervojn, ostojn, cerbon de ekzistantaj laboristoj kaj generi novajn laboristojn. Ene de tiuj limoj de tio, kio estas absolute necesa, la individua konsumado de la laborista klaso estas do retransformado de la vivrimedoj elspezitaj de la kapitalo kontraŭ laborforto en laborforton nove ekspluateblan de la kapitalo. Ĝi estas produktado kaj reproduktado de la produktadrimedoj nemalhaveblaj de la kapitalisto, de la laboristo mem. La individua konsumado de la laboristo restas do elemento de produktado kaj reproduktado de la kapitalo, egale ĉu ĝi okazas ene aŭ ekstere de la laborprocezo, tute same kiel la purigado de maŝino, ĉu ĝi okazas dum la laborprocezo aŭ dum iaj paŭzoj de ĝi. La fakto ŝanĝas neniom en la afero, ke la laboristo faras sian individuan konsumadon por si mem kaj ne por la kapitalisto. Same, la konsumo de la tirbestoj estas ne malpli necesa elemento de la produktadprocezo, kvankam la bestoj ĝuas mem tion, kion ili manĝas. La konstanta konservado kaj reproduktado de la laborista klaso restas konstanta kondiĉo por la reproduktado de la kapitalo. La kapitalisto povas senzorge allasi ĝian plenumadon al la instinkto de memkonserviĝo kaj de generado de la laboristoj. Li zorgas nur por tio, kiom eble plej limigi ilian individuan konsumadon al la necesaj kvanto kaj kvalito, kaj estas ege malproksima de tiu sudamerika kruelaĵo, kiu devigas la laboriston konsumi pli substancajn ol malpli substancajn nutraĵojn.[12]

11 Rossi ne tiom emfaze deklamus tiun punkton, se li vere enpenetrintus en la sekreton de la „*produktiva konsumado*” („*productive consumption*”). –

La ekonomikistoj, kiuj konsideras normala tiun koincidon de individua konsumado kaj produktiva konsumado, devas nepre klasi la vivrimedojn de la laboristo al la nombro de la helpmaterialoj, kiel oleo, karbo ktp, kiuj estas konsumataj de la laborinstrumentoj kaj sekve konsistigas elementon de la produktiva kapitalo. Rossi fulmas kontraŭ tiu klasado, forgesante ke se la vivrimedoj de la laboristoj ne eniras en la produktivan kapitalon, la laboristo mem estas parto de ĝi. (*Tiu ĉi paragrafo estas piednoto el la franca eldono. -vl)*

12 „La laboristoj en la minejoj de Sudameriko, kies ĉiutaga tasko (eble la plej peza en la mondo) konsistas en portado de ŝarĝo de erco, en la pezo de 100 ĝis

Pro tio la kapitalisto kaj lia ideologo, la ekonomikisto, konsideras nur la parton de la individua konsumado de la laboristo kiel produktivan, kiu necesas por eternigo de la laborista klaso, do devas esti konsumata por ke la kapitalo konsumu la laborforton; tio, kion la laboristo povas krome konsumi por sia plaĉo, estas neproduktiva konsumado.[13] Se la akumulado de la kapitalo kaŭzus altigon de la salajro kaj pro tio pliigon de la konsumrimedoj de la laboristo sen konsumado de pli da laborforto fare de la kapitalo, tiam la aldona kapitalo estus konsumata neproduktive.[14] Efektive: la individua konsumado de la laboristo estas por li mem neproduktiva, ĉar ĝi reproduktas nur la bezonantan individuon; ĝi estas produktiva por la kapitalisto kaj por la ŝtato, ĉar ĝi estas produktado de la forto kiu produktas la fremdan riĉaĵon.[15]

Do, el socia vidpunkto la laborista klaso, ankaŭ ekster la rekta laborprocezo, estas same apartenaĵo de la kapitalo kiel la morta laborinstrumento. Eĉ ĝia individua konsumado estas, ene de certaj limoj, nur elemento de la reproduktadprocezo de la kapitalo. Sed la procezo zorgas por tio, ke tiuj memkonsciaj produktadinstrumentoj ne forkuru, per tio, ke ĝi konstante malproksimigas ilian produkton de ilia poluso al la kontraŭpoluso de la kapitalo. La individua konsumado zorgas unuflanke por ilia propra vivtenado kaj reproduktado, aliflanke per neniigo de la vivrimedoj por ilia konstanta reapero en la labormerkato. La roma sklavo estis ligita per katenoj, la dunglaboristo per nevideblaj fadenoj al sia proprietulo. La ŝajno de lia sendependeco estas konservata per la konstanta ŝanĝo de la individuaj dungistoj kaj la jura fikcio de la kontrakto.

Antaŭe la kapitalo, kie ŝajnis al ĝi necese, trudis sian rajton je proprieto

---

200 funtoj, el profundo de 450 futoj sur siaj ŝultroj, vivas jam nur per pano kaj fazeoloj; ili preferus sole la panon kiel nutraĵon, sed iliaj mastroj, kiuj malkovris, ke ili per pano ne povas labori tiom forte, traktas ilin kvazaŭ ĉevalojn kaj devigas ilin manĝi la fazeolojn; sed la fazeoloj estas kompare multe pli riĉaj je ostotero (kalkfosfato) ol pano.” (Liebig, l.c., 1-a parto, p. 194, noto)

13 James Mill, l.c., p. 238 sj.

14 „Se la prezo de la laboro altiĝus tiom, ke malgraŭ la alkresko de kapitalo ne eblus apliki pli da laboro, tiam mi dirus, ke tia alkresko de kapitalo estas konsumata neproduktive.” (Ricardo, l.c., p. 163)

15 „La sole produktiva konsumado en la propra senco estas la konsumado aŭ detruado de riĉaĵo” (li celas la konsumadon de la produktadrimedoj) „fare de la kapitalisto cele al la reproduktado … La laboristo … estas produktiva konsumanto por la persono, kiu aplikas lin, kaj por la ŝtato, sed, precize dirite, ne por si mem.” (Malthus, „*Definitions etc*”, p. 30)

pri la libera laboristo per deviga leĝo. Ekz-e la elmigrado de la maŝin-laboristoj en Anglio estis ĝis 1815 malpermesita je peza puno.

La reproduktiĝo de la laborista klaso inkludas samtempe la tradiciadon kaj akumuladon de la lerteco de unu generacio al la alia.[16] Kiom atente la kapitalisto nombras la ekziston de tia lerta laborista klaso inter la al li apartenantaj produktadkondiĉoj, konsideras ĝin efektive kiel la reala ekzistado de sia varia kapitalo, tio montriĝas, ekde kiam krizo minacas ĝian perdon. Sekve al la usona interna milito kaj al la kotonmanko kiu akompanis ĝin, oni surstratigis, kiel konate, la plimulton de la kotonlaboristoj en Lankaŝiro ktp. El la sino de la laborista klaso mem, kiel de aliaj sociaj tavoloj, leviĝis la voko je ŝtata subteno aŭ je libervola nacia kolektado, por ebligi la elmigradon de la „superfluaj” en la anglajn koloniojn aŭ en Usonon. Tiam la *Times* (24-a de marto 1863) publikigis leteron de Edmund Potter, prezidinto de la manĉestra komerca ĉambro. Lia letero estis prave kvalifikata en la deputita ĉambro kiel „la manifesto de la fabrikistoj”.[17] Ni citu ĉi tie kelkajn karakterizajn teksterojn, en kiuj la proprieto de la kapitalo je la laborforto estas senĝene esprimata.

> „Al la kotonlaboristoj oni povas diri, ke ili estas tro en la labormerkato … ili reduktendas je triono, kaj tiam okazus sana postulo por la ceteraj tri trionoj … La publika opinio insistas pri elmigrado … La majstro” (t.e. la kotonfabrikisto) „ne povas konsente vidi sian laborist-provizon malproksimiĝi; li povas pensi, ke tio estas same maljusta kiel malĝusta … Se la elmigrado estas subtenata el publika fonduso, li havas rajton esti aŭskultata kaj eble protesti.”

Tiu sama Potter poste insistas pri la eksterordinara utileco de la koton-industrio, ke ĝi „nedubeble fordrenis la troan loĝantaron el Irlando kaj el la anglaj kampkulturaj distriktoj”, pri ĝia granda amplekso, ke ĝi liveris en la jaro 1860 $^{5}/_{13}$ de la tuta angla eksportkomerco, ke ĝi post malmultaj jaroj denove etendiĝos per etendado de la merkato, speciale de Hindio, kaj per akiro de sufiĉa kvanto de „kotonprovizo, je 6 pencoj por la funto”. Kaj li daŭrigas:

> „La tempo – eble unu, du, tri jaroj – produktos la necesan kvanton … Mi

16 „La sola afero, pri kiu direblas, ke ĝi estas stokata kaj antaŭe preparita, estas la lerteco de la laboristo … La akumulado kaj stokado de lerta laboro, tiu plej grava operacio estas plenumata, koncerne la grandan amason de la laboristoj, sen ia ajn kapitalo.” (Hodgskin, *„Labour Defended etc.”*, p. 12, 13)

17 „Tiu letero rigardeblas kiel manifesto de la fabrikistoj.” (Ferrand, Leĝpropono pri la kotonmizero, sesio de la H. o. C. (deputita ĉambro) de la 27-a de aprilo 1863)

> ŝatus nun starigi la demandon, ĉu tiu ĉi industrio ne meritas ke oni konservu ĝin? Mi kredas tion. Mi koncedas, ke la laboristoj ne estas proprietoj (I allow that the workers are not a propterty), ne la proprieto de Lankaŝiro kaj de la mastroj; sed ili estas la forto de ambaŭ; ili estas la spirita kaj instruita forto, kiu ne estas anstataŭigebla en unu generacio; la alia maŝinaro, male, ĉe kiu ili laboras (the mere machinery which they work), male, grandparte anstataŭigeblus kaj plibonigeblus kun avantaĝo en dek du monatoj.[18] Kuraĝigu aŭ permesu" (!) „la elmigradon de la laborforto, kaj kio fariĝos la kapitalisto? (*Encourage or allow the working power to emigrate, and what of the capitalist?*)"

Tiu krio el la korfundo memorigas la kortegan marŝalon Kalb.[19]

> „… Forprenu la kremon de la laboristoj, kaj la fiksa kapitalo estas altgrade senvalorigata kaj ne elmetiĝos al la batalo kun malgranda provizo de malpli alta speco de laboro … Oni diras al ni, ke la laboristoj mem deziras la elmigradon. Estas tute nature, ke ili faras tion … Reduktu, kunpremu la kotonaferon per forpreno de ĝiaj laborfortoj (by taking away its working power), per malpliigo de ilia salajroelspezo je proksimume triono aŭ 5 milionoj, kaj kio fariĝos poste la sekva klaso super ili, la etkomercistoj? Kio la grundrentoj, kio la luprezo de la kabanoj (cottages)? … kio la etfarmisto, la pli bonstata domposedanto kaj la grundproprietulo? Kaj nun diru, ĉu ia ajn plano por ĉiuj klasoj de la lando povas esti pli memmortiga ol tiu, malfortigi la nacion per la eksporto de ĝiaj plej bonaj faklaboristoj kaj per la senvalorigo de parto de ĝia plej produktiva kapitalo kaj riĉaĵo?" „Mi konsilas prunton de 5 ĝis 6 milionoj, dividita tra du aŭ tri jaroj, administrata de specialaj komisaroj, almetitaj al la administrejoj de malriĉuloj en la kotondistriktoj, sub specialaj leĝaj reguladoj, kun certa deviga laboro, por konservi la valoron de la almozricevantoj … Ĉu povas ekzisti io pli malbona por la grundproprietuloj aŭ majstroj (can anything be worse for landowners or masters), ol rezigni pri iliaj plej bonaj

18 Oni memoru, ke la sama kapitalo kantas alian kanton sub ordinaraj cirkonstancoj, kiam temas pri malaltigo de la salajro. Tiam deklaras „la majstroj" unuvoĉe (vidu la Kvaran Sekcion, noto 188, p. 389 <Vidu tiun ĉi volumon, p. 446> [Vidu en tiu ĉi Esperanta eldono, vol. 2, Ĉapitron deka ĝis dektria, paĝo 139. -vl]): „La fabriklaboristoj tenu en bonfara memoro la fakton ke ilia laboro estas efektive tre malalta speco de lerta laboro; ke neniu estas pli facile akirebla kaj konsidere ĝian kvaliton pli bone rekompencata, ke sufiĉas plej eta lernado por akiri la necesan lertecon. La maŝinoj de la mastro" (kiu, kiel ni aŭdas nun, povas en 12 monatoj kun avantaĝo esti plibonigita kaj anstataŭigita) „ludas fakte pli gravan rolon en la produktado ol la laboro kaj la lerteco de la laboristo" (kiuj nun ne anstataŭigeblas en 30 jaroj), „kiuj akireblas per nur sesmonata instruado kaj kiujn simpla plugisto povas lerni."

19 Kortega marŝalo von Kalb estas figuro de la dramo *Kabalo kaj amo* („Kabale und Liebe") de Ŝilero. Li fariĝis la pratipo de pompama, malkuraĝa kaj al aŭtoritato submetiĝema kortegano. -vl

> laboristoj kaj demoralizi la restantajn kaj seniluziigi ilin per ampleksa malpleniganta elmigrado kiu malplenigas valoron kaj kapitalon en tuta provinco?”

Potter, la elektita organo de la kotonfabrikistoj, distingas duoblan „maŝinaron”, el kiu ĉiu apartenas al la kapitalisto kaj el kiu unu staras en lia fabriko, la alia loĝas nokte kaj dimanĉe ekstere en kabanoj. La unua estas morta, la alia vivanta. La morta maŝinaro malboniĝas kaj senvaloriĝas ne nur ĉiutage, sed granda kvanto de ĝi tiom arĥiiĝas per la konstanta teĥnika progreso, ke ĝi anstataŭigeblas kun avantaĝo kaj en malmultaj monatoj per nova maŝinaro. La vivanta maŝinaro inverse pliboniĝas des pli, ju pli ĝi daŭras, ju pli ĝi akumulas en si la lertecon de generacioj. La *Times* respondis al la fabrikestro i.a.:

> „S-ro Potter estas tiom impresita de la eksterordinara kaj absoluta graveco de la kotonmastroj, ke li, por konservi tiun klason kaj eternigi ilian metion, volas enfermi duonan milionon el la laborista klaso kontraŭ ilia volo en grandan moralan azilon. Ĉu tiu industrio valoras, reteni ilin? demandas s-ro Potter. Certe, per ĉiaj honorindaj rimedoj, respondas ni. Ĉu valoras la penon teni la maŝinaron en ordo? ree demandas s-ro Potter. Ĉi tie ni hezitas. Sub la maŝinaro s-ro Potter komprenas la homan maŝinaron, ĉar li asertas, ke li ne intencas trakti ĝin kiel absolutan proprieton. Ni devas konfesi, ke ni ne konsideras ‘valora la penon’ aŭ eĉ nur ebla, teni la homan maŝinaron en ordo, t.e. enfermi kaj grasigi ĝin, ĝis kiam oni bezonas ĝin. Homa maŝinaro havas la econ forrusti dum la nenifarado, eĉ se vi multe grasigas aŭ frotas ĝin. Krome la homa maŝinaro kapablas, kiel la evidento ĵus instruas al ni, memstare meti la vaporon kaj eksplodi aŭ fari diablan dancon en niaj grandaj urboj. Eble, kiel s-ro Potter diras, necesas iom pli longa tempo por reproduktado de la laboristoj, sed kun disponataj maŝinistoj kaj mono ni trovos ĉiam laboremajn, eltenemajn industriajn virojn, por fabriki el ili pli da fabrikmajstroj ol ni iam ajn povas uzi … S-ro Potter babilas pri revigligo de la industrio en unu, du, tri jaroj kaj postulas de ni ne kuraĝigi aŭ ne permesi la elmigradon de la laborforto! Li diras, ke estas nature ke la laboristoj deziras elmigri, sed li celas, ke la nacio devas enfermi tiun duonan milionon da laboristoj kun la 700.000, kiuj dependas de ili, spite al ilia deziro, en la kotondistriktoj kaj, nepra konsekvenco, disbati ilian malplezuron perforte kaj teni ilin vivaj per almozoj, ĉio kun la bonŝanco ke la kotonmajstroj iun ajn tagon ree bezonos ilin … La tempo venis, kie la granda publika opinio de tiu ĉi insularo devas fari ion, por savi ‘tiun laborforton’ kontraŭ tiuj, kiuj volas trakti ĝin kvazaŭ karbon, feron kaj kotonon *(to save this ‘working power’ from those who would deal with it as they deal with iron, coal and cotton)*.”[20]

La *Times*-artikolo estis nur sprita pensludo. La „granda publika opinio” efektive opiniis kiel s-ro Potter, ke la fabriklaboristoj estas moveblaĵo

20 *Times*, 24-a de marto 1863.

apartenanta al la fabrikoj. Ilia elmigrado estis malebligata.[21] Oni enfermis ilin en la „moralan azilon” de la kotondistriktoj, kaj ili konsistigas kiel antaŭe „la forton (*the strength*) de la kotonmastroj de Lankaŝiro”.

La kapitalisma produktadprocezo reproduktas do per sia propra okazigo la disigon inter laborforto kaj laborkondiĉoj. Ĝi reproduktas kaj eternigas per tio la ekspluatkondiĉojn de la laboristo. Ĝi devigas konstante la laboriston vendi sian laborforton por vivi, kaj konstante kapabligas la kapitaliston aĉeti ĝin por riĉiĝi.[22] Jam ne estas la hazardo, kiu metas en la varmerkato kapitaliston kaj laboriston kiel aĉetanton kaj vendanton unu kontraŭ la alian. Estas la duobla muelilo de la procezo mem, kiu ĉiam reĵetas la unuajn kiel vendantojn de sia laborforto en la varmerkaton kaj transformas lian propran produkton ĉiam en la aĉetrimedon de la alia. Efektive la laboristo apartenas al la kapitalo, antaŭ ol li vendas sin al la kapitalisto. Lia ekonomia servuteco[23] estas samtempe perata kaj kaŝata

21 La parlamento voĉdonis eĉ ne pencon por elmigrado, sed nur leĝojn, kiuj ebligis la distriktojn teni la laboristojn inter vivo kaj morto aŭ ekspluati ilin sen pago de normalaj salajroj. Kiam tri jarojn poste furiozis la bovpesto, la parlamento, male, rompis sovaĝe eĉ la parlamentan etiketon kaj voĉdonis en turno de la mano milionojn por kompensi la grundsinjorajn milionulojn, kies farmistoj sen tio kompensis sin per altigo de la viandoprezoj. La besta blekegado de la grundproprietuloj dum la malfermo de la parlamento de 1866 pruvis, ke oni ne bezonas esti hinduo por adori la bovinon Sabala, nek Jupitero, por transformiĝi en bovon.

22 „La laboristo postulis rimedojn por vivi, la ĉefo postulis laboron por gajni.” (Sismondi, l.c., p. 91)

23 Kampula maldelikata formo de tiu servuteco ekzistas en la distrikto *Durham*. Tiu estas unu el la malmultaj distriktoj, en kiuj la kondiĉoj ne senkonteste certigas al la farmisto propriettitolojn pri la kamplaboraj taglaboristoj. La mineja industrio permesas al tiuj lastaj elekton. La farmisto, kontraste al la regulo, transprenas do nur farmon de teroj, sur kiuj troviĝas kabanoj por la laboristoj. La luprezo de la kabanoj konsistigas parton de la salajro. Tiuj kabanoj nomiĝas „*hind’s houses*” („kamplaboristaj domoj”). Ili estas luataj al la laboristoj sub certaj feŭdaj kondiĉoj sub traktato, kiu nomiĝas „*bondage*” (servuto) kaj kiu ligas la laboriston ekz-e por la tempo, dum kiu li esta okupata aliloke, disponigi sian filinon. La laboristo mem nomiĝas *bondsman*, servutulo. Tiu rilato montras ankaŭ la individuan konsumadon de la laboristo kiel konsumadon de la kapitalo aŭ produktivan konsumadon – el tute nova flanko: „Estas strange observi, kiel eĉ la koto de tiu *bondsman* eniras la liston de la kalkulanta mastro … La farmisto permesas en la tuta najbareco nenian alian fekejon ol la siajn, kaj tiurilate toleras nenian rompon de lia sinjora rajto.” („*Public Health, Report VII., 1864*”, p. 188)

per la perioda renovigo de lia memvendo, la ŝanĝo de liaj individuaj mastroj kaj la oscilado de la merkatprezo de la laboro.[24]

La kapitalisma produktadprocezo, rigardata en kunteksto aŭ kiel reproduktadprocezo, produktas do ne nur varon, ne nur plusvaloron, ĝi produktas kaj reproduktas la kapitalrilaton mem, ĉe unu flanko la kapitaliston, ĉe la alia la dunglaboriston.[25]

24 Oni memoru ke ĉe la laboro de infanoj ktp eĉ la formaleco de la memvendo malaperas.

25 „La kapitalo premisas la dunglaboron, la dunglaboro premisas la kapitalon. Ili premisas sin reciproke, ili produktas sin reciproke. Laboristo en kotonfabriko, ĉu li produktas nur kotonŝtofojn? Ne, li produktas kapitalon. Li produktas valorojn, kiuj servas denove por komandi lian laboron kaj pere de tiu krei novajn valorojn." (Karl Marx: Lohnarbeit und Kapital" [Karlo Markso: „Dunglaboro kaj kapitalo", en *„N[eue] Rh[einische] Z[eitung]"*, n-ro 266, 7-a de aprilo 1849) La sub tiu titolo en la „N.Rh.Z." publikigitaj artikoloj estas eltiraĵoj el prelegoj, kiujn mi faris pri tiu temo en 1847 en la germana laborist-asocio en Bruselo kaj kies presado estis interrompita pro la februara revolucio. <Vidu vol. 6, p. 410> –

En Esperanto, vidu Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7, p. 22. -vl

# *DUDEKDUA ĈAPITRO – Transformado de plusvaloro en kapitalon*

## 1. Kapitalisma produktadprocezo sur etendita skalo. Ŝanĝo de la proprietleĝoj de la varproduktado en leĝojn de la kapitalisma alproprigo

Antaŭe ni rigardis, kiel la plusvaloro fontas el la kapitalo, nun ni vidos, kiel la kapitalo fontas el la plusvaloro. Aplikado de plusvaloro kiel kapitalo aŭ retransformado de plusvaloro en kapitalon nomiĝas akumulado de kapitalo.[26]

Ni rigardu tiun okazaĵon unue el la vidpunkto de la unuopa kapitalisto. Ni supozu ke ŝpinisto ekz-e antaŭpagis kapitalon de 10.000 sterlingaj pundoj, el kiu kvar kvinonoj por kotono, maŝinoj ktp, la lastan kvinonon por salajro. Li produktas jare ekz-e 240.000 funtojn da fadeno en la valoro de 12.000 pundoj. Ĉe kvoto de plusvaloro de 100 % la plusvaloro troviĝas en la plusprodukto aŭ neta produkto de 40.000 funtoj da fadeno, sesono de la malneta produkto, je la valoro de 2.000 pundoj, kiun la vendo realigos. Valorsumo de 2.000 pundoj estas valorsumo de 2.000 pundoj. Oni ne flaras aŭ vidas ĉe tiu mono, ke ĝi estas plusvaloro. La karaktero de valoro kiel plusvaloro nur montras, kiel ĝi venis al sia proprietulo, sed ŝanĝas neniel la naturon de la valoro aŭ de la mono.

Por transformi la nove alvenintan sumon de 2.000 pundoj en kapitalon, la ŝpinisto, ĉe ĉiaj ceteraj cirkonstancoj senŝanĝaj, devas antaŭpagi kvar kvinonojn da tio por aĉeti kotonon ktp kaj kvinonon por aĉeti novajn ŝpinlaboristojn, kiuj trovos en la merkato la vivrimedojn, kies valoron li antaŭpagis al ili. Tiam la nova kapitalo de 2.000 pundoj funkcias en la ŝpinejo kaj siavice alportas plusvaloron de 400 pundoj.

La kapitalvaloro estis unue antaŭpagita en monformo; la plusvaloro, male, ekzistas dekomence kiel valoro de certa parto de la malneta pruduk-to. Se tiu estas vendata, transformata en monon, tiam la kapitalvaloro regajnas sian originan formon, sed la plusvaloro transformas sian originan estmanieron. Sed ekde tiu momento, kapitalvaloro kaj plusvaloro estas

---

26 „Akumulado de kapitalo: la uzado de parto de la enspezo kiel kapitalo.” (Malthus „Definitions etc”, ed. Cazenove, p. 11) „Transformado de enspezo en kapitalon.” (Malthus *„Princ. of Pol. Econ.”*, 2-a eld., Londono, 1836, p. 320)

ambaŭ monsumoj, kaj ilia retransformado en kapitalon plenumiĝas tute same. La kapitalisto investas la unuan kiel la alian en aĉetado de la varoj kiuj kapabligas lin denove komenci la pretigadon de sia artiklo, kaj ĉi-foje sur etendita skalo. Sed por aĉeti tiujn varojn, li devas trovi ilin en la merkato.

Liaj propraj fadenoj cirkulas nur, ĉar li surmerkatigas sian jarprodukton, same kiel ĉiuj kromaj kapitalistoj faras pri siaj varoj. Sed antaŭ ol veni en la merkaton, ili troviĝis jam en la jara produktfonduso, do en la ĉiomkvanto de ĉiaj aĵoj al kiu la ĉiomsumo de la unuopaj kapitaloj aŭ la socia ĉiomkapitalo dum la jaro transformiĝas kaj el kiu ĉiu unuopa kapitalisto tenas en siaj manoj nur proporcian parton. La okazaĵoj en la merkato kaŭzas nur la interŝanĝon de la unuopaj partoj de la jarproduktaĵo, sendas ilin de unu mano al alia, sed ili povas nek pligrandigi la ĉioman jarproduktaĵon nek ŝanĝi la naturon de la produktitaj objektoj. Do, kia uzo de la jara produktaĵo fareblas, tio dependas de ĝia propra konsisto, sed tute ne de la cirkulado.

Unue la jara produktado devas liveri ĉiujn objektojn (uzvalorojn), per kiuj la aĵaj partoj de la kapitalo, konsumitaj dum la jaro, estas anstataŭigendaj. Post depreno de ili, restas la neta produkto, aŭ plusprodukto, en kiu troviĝas la plusvaloro. Kaj el kio konsistas tiu plusprodukto? Ĉu eble en aĵoj, destinitaj kontentigi la bezonojn kaj avidojn de la kapitalista klaso, kiuj do eniras la konsumfonduson? Se tio estus ĉio, tiam la plusvaloro estus fordiboĉata ĝis la feĉo, kaj okazus nur simpla reproduktado.

Por akumuli, oni devas transformi parton de la plusvaloro en kapitalon. Sed, sen fari miraklojn, oni povas transformi en kapitalon nur tiajn aĵojn, kiuj uzeblas en la laborprocezo, do, produktadrimedojn, kaj krome aĵojn, per kiuj la laboristo povas vivteni sin, do vivrimedojn. Sekve, parto de la jara pluslaboro uzendas por produktado de kromaj produktad- kaj vivrimedoj, en kromaĵo super la kvanto, kiu estis necesa por anstataŭi la antaŭpagitan kapitalon. Unuvorte: la plusvaloro estas transformebla en kapitalon nur ĉar la plusprodukto, kies valoro ĝi estas, entenas jam la materiajn elementojn de nova kapitalo.[27]

27 Ĉi tie ni abstraktas la eksportan komercon, per kiu nacio povas ŝanĝi luksajn artiklojn en produktad- kaj viv-rimedojn, kaj inverse. Por kompreni la objekton de la esplorado en ĝia pureco, libera de ĝenaj flankcirkonstancoj, ni devas ĉi tie konsideri la tutan komercan mondon kiel unu nacion kaj supozi, ke la kapitalisma produktado enradikiĝis ĉie kaj akaparis ĉiujn industribranĉojn.

Por ke la kapitalista klaso povu nun efektive funkciigi tiujn elementojn kiel kapitalon, ĝi bezonas aldonan laboron. Se la ekspluatado de la jam okupataj laboristoj ne devas kreski instense aŭ malintense, tiam necesas dungi kromajn laborfortojn. Por tio la meĥanismo de la kapitalisma produktado ankaŭ jam zorgis, per tio ke ĝi reproduktas la laboristan klason kiel klason kiu dependas de la salajro kaj kies ordinara salajro sufiĉas ne nur por certigi ĝian vivtenadon, sed ankaŭ ĝian pliiĝon. La kapitalo bezonas enkorpigi tiujn kromajn laborfortojn, kiuj estas al ĝi ĉiujare liverataj de la laborista klaso je diversaj aĝoj, en la kromajn produktadrimedojn, kiuj estas jam entenataj en la jara produktaĵo, kaj jen la transformado de la plusvaloro en kapitalon estas farita. Ĉe konkreta rigardo, la akumulado dissolviĝas en reproduktadon de la kapitalo en progresa skalo. La cirklo de la simpla reproduktado etendiĝas kaj ŝanĝiĝas, laŭ la esprimo de Sismondi, en spiralon.[28]

Ni revenu nun al nia ekzemplo. Estas la malnova historio: Abrahamo generis Izaakon, Izaako generis Jakobon ktp. La origina kapitalo de 10.000 pundoj alportas plusvaloron de 2.000 pundoj, kiu estas kapitaligata. La nova kapitalo de 2.000 pundoj alportas plusvaloron de 400 pundoj; tiu, ree kapitaligita, do transformita en duan kromkapitalon, alportas novan plusvaloron de 80 pundoj, ktp.

Ni ne konsideru ĉi tie la parton de la plusvaloro, kiun la kapitalisto forkonsumas. En la momento ankaŭ ne interesas nin, ĉu la kromaj kapitaloj estas aldonitaj al la origina kapitalo aŭ disigitaj por memstara plivalorigo; ĉu la sama kapitalisto, kiu akumulis ilin, ekspluatas ilin, aŭ ĉu li transigas ilin al aliaj. Sed ni ne forgesu, ke apud la nove estigitaj kapitaloj la origina kapitalo daŭre reproduktiĝas kaj daŭre produktas plusvaloron, kaj la samo veras por ĉiu akumulita kapitalo en rilato al la kroma kapitalo kiun ĝi siavice generis.

La origina kapitalo estiĝis per la antaŭpago de 10.000 sterlingaj pundoj. De kie ilia posedanto havas ilin? El sia propra laboro kaj el tiu de siaj antaŭuloj! respondas al ni unuvoĉe la porparolantoj de la politika ekonomio[29], kaj ilia supozo ŝajnas efektive la sola, kiu kongruas kun la leĝoj de la varproduktado.

28 La analizo de la akumulado, kiun faris Sismondi, havas la grandan mankon ke li tro kontentiĝas per la frazo: „transformado de enspezo en kapitalon”, sen esplori la materiajn kondiĉojn de tiu operacio.

29 „La origina laboro, al kiu la kapitalo ŝuldis sian estiĝon.” (Sismondi, l.c., eld. Parizo, vol. I, p. 109)

Tute alie statas pri la kromkapitalo de 2.000 sterlingaj pundoj. Ties estiĝprocezon ni konas tute precize. Ĝi estas kapitaligita plusvaloro. Ekde ĝia komenco ĝi entenas eĉ ne unu valoratomon kiu ne devenas el nepagita fremda laboro. La produktadrimedoj, al kiuj la kroma laborforto estas enkorpigata, same kiel la vivrimedoj, per kiuj tiu vivtenas sin, estas nenio alia ol integraj partoj de la plusprodukto, de la tributo, kiun la kapitalista klaso ĉiujare elŝiras el la laborista klaso. Se la kapitalista klaso per parto de tiu tributo aĉetas kroman laborforton, eĉ je ĝia plena prezo, tiel ke ekvivalento interŝanĝiĝas kontraŭ ekvivalento – tio restas ĉiam la malnova procedo de la konkeranto, kiu aĉetas de la venkitoj varojn per ties propra, rabita mono.

Kiam la kromkapitalo laborigas sian propran produktinton, tiam tiu devas unue daŭre plivalorigi la originan kapitalon, kaj krome reaĉeti la produkton de sia antaŭa laboro per pli da laboro ol ĝi kostis.[30] Rigardate kiel transakcio inter la kapitalista klaso kaj la laborista klaso, la proceduro neniel ŝanĝiĝas, se per la nepagita laboro de la ĝis nun laborantaj laboristoj dungiĝas kromaj laboristoj. La kapitalisto transformas la kromkapitalon eble en maŝinon, kiu ĵetas la produktinton de la kromkapitalo sur la straton kaj anstataŭigas lin per kelkaj infanoj. En ĉiuj kazoj la laborista klaso kreis per sia ĉi-jara pluslaboro la kapitalon, kiu en la venonta jaro laborigos kroman laboron.[31] Jen kion oni nomas: krei kapitalon per kapitalo.

La premiso de la akumulado de la unua kromkapitalo de 2.000 pundoj estis valorsumo de 10.000 pundoj, antaŭpagita de la kapitalisto kaj kiu apartenas al li pro lia „origina laboro”. Sed la premiso de la dua kromkapitalo de 400 pundoj estas nenio alia ol la antaŭa akumulado de la unua, de la 2.000 pundoj, kies kapitaligita plusvaloro ĝi estas. Proprieto je pasinta nepagita laboro aperas nun kiel la sola kondiĉo por nuna alproprigo de vivanta nepagata laboro en ĉiam kreskanta amplekso. Ju pli la kapitalisto akumulis, des pli li povas akumuli.

Se la plusvaloro, el kiu la kromkapitalo n-ro 1 konsistas, estas la rezulto de la aĉeto de la laborforto per parto de la originala kapitalo, aĉeto kiu okazis laŭ la leĝoj de varinterŝanĝo kaj, el jura vidpunkto, premisas nenion alian ol la liberan disponon flanke de la laboristo pri siaj propraj

30 *En la franca versio, post la lasta komo, jene:* „devas reaĉeti la fruktojn de sia antaŭa nepagita laboro per pli da kroma laboro ol ĝi kostis”. -vl

31 „La laboro kreas la kapitalon, antaŭ ol la kapitalo aplikas la laboron.” („*Labour creates capital, before capital employs labour.*”) (E. G. Wakefield, „*England and America*”, Londono, 1833, vol. II, p. 110)

kapabloj, flanke de la mon- aŭ var-posedanto pri la valoroj apartenantaj al li; se la kromkapitalo n-ro 2 ktp estis nur rezulto de la kromkapitalo n-ro 1, do konsekvenco de tiu unua rilato[32]; se ĉiu unuopa transakcio okazas konstante laŭ la leĝo de la varinterŝanĝo, la kapitalisto ĉiam aĉetas la laborforton, la laboristo ĝin vendas, kaj ni supozu je ĝia reala valoro, tiam la leĝo de alproprigo aŭ leĝo de privata proprieto, baziĝanta sur la var-produktado kaj varcirkulado, evidente transformiĝas, per sia propra, interna, neevitebla dialektiko, en sian propran malon. La interŝanĝo de ekvivalentoj, kiu aperis kiel origina operacio, turniĝis tiel, ke interŝanĝado okazas nur ŝajne, per tio ke la kapitalparto interŝanĝita kontraŭ laborforto estas, unue, mem nur parto de la fremda laborprodukto alproprigita sen ekvivalento, kaj, due, devas esti ne nur anstataŭigota de sia produktinto, la laboristo, sed anstataŭigota kun nova plusvaloro[33]. La rilato de interŝanĝo inter kapitalisto kaj laboristo fariĝas do nur ŝajno apartenanta al la cirkuladprocezo, nura formo, kiu estas al la enhavo mem fremda kaj kiu nur mistifikas ĝin. La konstanta aĉetado kaj vendado de la laborforto estas la formo. La enhavo estas, ke la kapitalisto ĉiam denove vendas parton de la jam konkretigita fremda laboro, kiun li senĉese alproprigas al si sen ekvivalento, kontraŭ pli granda kvanto da vivanta fremda laboro. Komence la rajto je proprieto ŝajnis al ni bazita sur propra laboro. Tiu supozo devis ja validi, ĉar alpaŝas sin reciproke nur egalrajtaj varposedantoj, sed la rimedo por alproprigo de fremda varo estas nur la vendo de la propra varo, kaj tiu estigeblas nur per laboro. Proprieto aperas nun flanke de la kapitalisto kiel la rajto alproprigi fremdan nepagatan laboron aŭ ties produkton. La disigo inter proprieto kaj laboro fariĝas nepra konsekvenco de leĝo, kiu ŝajne eliris de ilia identeco.[34]

Kvankam tiu kapitalisma alproprigmaniero tiom kontrastas kun la originaj leĝoj de varproduktado, ĝi tamen tute ne fontas el la rompo, sed male el la aplikado de tiuj leĝoj. Mallonga rerigardo al la vico da moviĝfazoj, kies fina punkto estas la kapitalisma akumulado, refoje klarigu tion.

Unue ni vidis, ke la origina transformado de valorsumo en kapitalon okazis tute laŭ la leĝoj de interŝanĝo. Unu el la interŝanĝantoj vendas sian

32 *En la originalo:* „also Konsequenz jenes ersten Verhältnisses”. -vl

33 *En la originalo:* „… mit neuem Surplus …”. -vl

34 La proprieto de la kapitalisto je la fremda laborprodukto „estas strikta konsekvenco de la leĝo de alproprigo, kies fundamenta principo estis inverse la ekskluziva propriettitolo de ĉiu laboristo je la produkto de sia propra laboro”, (Cherbuliez: „*Richesse ou Pauvreté*”, Parizo, 1841, p. 58, kie tamen tiu dialektika transiĝo [orig. „*Umschlag*” -vl] ne estas ĝuste disvolvita.)

laborforton, la alia aĉetas ĝin. La unua ricevas la valoron de sia varo, kies uzvaloro – la laboro – estas per tio eksterigita[35] al la dua. Tiu transformas nun produktadrimedojn, kiuj jam apartenas al li, helpe de laboro, kiu ankaŭ apartenas al li, en novan produkton, kiu laŭjure apartenas ankaŭ al li.

La valoro de tiu produkto inkludas: unue la valoron de la konsumitaj produktadrimedoj. La utila laboro ne povas konsumi tiujn produktadrimedojn sen transigi ilian valoron al la nova produkto; sed por esti vendebla, la laborforto devas kapabli liveri utilan laboron en la industribranĉo, en kiu ĝi devas esti aplikata.

La valoro de la nova produkto inkludas krome: la ekvivalenton de la valoro de la laborforto kaj plusvaloron. Kaj tio, ĉar la laborforto vendita por difinita tempo, tago, semajno ktp, posedas malpli da valoro, ol ĝia uzado dum tiu tempo kreas. Sed la laboristo ricevis la pagon de la interŝanĝvaloro de sia laborforto kaj per tio forcedis ties uzvaloron – kio okazas ĉe ĉia aĉeto kaj vendo.

Ke tiu aparta varo laborforto havas la apartan uzvaloron, liveri laboron, do krei valoron, tio ne povas tuŝi la ĝeneralan leĝon de la varproduktado. Se do la valorsumo antaŭpagita en salajro ne nur retroviĝas en la produkto, sed troviĝas kun plusvaloro, tio okazas ne ĉar la vendinto de la laborforto estis trompita, kiu ja ricevis la valoron de sia varo, sed nur el la konsumado de tiu varo fare de la aĉetinto.

La leĝo de interŝanĝo postulas egalecon nur por la interŝanĝvaloroj de la reciproke fordonataj varoj. Ĝi postulas eĉ apriore la diversecon de iliaj uzvaloroj kaj havas nenion por diri pri ilia konsumado, kiu komenciĝas nur post la decidita kaj plenumita interŝanĝo.

La origina transformado de mono en kapitalon okazas do en plej precisa harmonio kun la ekonomiaj leĝoj de varproduktado kaj kun la proprieta juro, kiu estas derivita de ĝi. Sed tamen ĝi havas la rezulton:

1-e ke la produkto apartenas al la kapitalisto kaj ne al la laboristo;

2-e ke la valoro de tiu produkto, krom la valoron de la antaŭpagita kapitalo, inkludas plusvaloron, kiu kostis al la laboristo laboron, sed al la kapitalisto neniom kaj kiu fariĝas tamen la laŭjura proprieto de la kapitalisto;

35 En la originalo: „*veräußert*”, kio *signifas vendita*, *eksterigita*, *forcedita*, *fremdigita*. Tiuj nocioj, devenaj el la hegela dialektiko, estas pli aŭ malpli identaj, kvankam ili malsamas en nuancoj. -vl

3-e ke la laboristo konservis sian laborforton kaj povas ree vendi ĝin, se li trovas aĉetonton.

La simpla reproduktado estas nur la perioda ripetado de tiu unua operacio; ĉiufoje, ĉiam denove, mono estas transformata en kapitalon. La leĝo do ne estas rompita, male, ĝi ricevas nur okazon konstante konfirmiĝi.

„Pluraj sinsekvaj interŝanĝoj faras el la lasta nur la reprezentanton de la unua.”[36]

Kaj tamen ni vidis, ke la simpla reproduktado sufiĉas por stampi al tiu unua operacio – se ĝi estis komprenita kiel izolita okazaĵo – totale ŝanĝitan karakteron.

„Inter tiuj, kiuj dividas inter si la nacian enspezon, la unuaj” (la laboristoj) „akiras ĉiujare per nova laboro novan rajton je ĝi, la aliaj” (la kapitalistoj) „jam antaŭe per origina laboro akiris daŭran rajton je ĝi.”[37]

La sfero de laboro estas, kiel konate, ne la sola, kie la unuenaskiteco faras miraklojn.[38]

Ankaŭ nenio ŝanĝiĝas, se la simpla reproduktado estas anstataŭigita per reproduktado je etendita skalo, per akumulado. Ĉe la unua la kapitalisto forkonsumas la tutan plusvaloron, ĉe la lasta li pruvas sian civitanan virton per konsumado nur de parto, kaj transformado de la resto en monon.

La plusvaloro estas lia proprieto, ĝi apartenis neniam al iu alia. Se li antaŭpagas ĝin por produktado, tiam li faras, tute kiel en la tago kiam li unue alpaŝis la merkaton, antaŭpagojn el sia propra fonduso. Ke tiu fonduso ĉi-foje devenas el nepagita laboro de liaj laboristoj, tio ŝanĝas neniom. Se laboristo B estas dungita per la plusvaloro, kiun laboristo A produktis, tiam unue A liveris tiun plusvaloron sen ke oni malaltigis eĉ ne

36 Sismondi, l.c., p. 70 (En la originalo: „Plusieurs échanges successifs n’ont fait du dernier que le représentant du premier.”

37 Sismondi, l.c., p. 110, 111. (*En la originalo:* „Parmi ceux qui se partagent le revenu national, les uns” (la laboristoj) „y acquièrent chaque année un nouveau droit par un nouveau travail, les autres” (la kapitalistoj) „y ont acquis antérieurement un droit permanent par un travail primitif.”

38 Aludo al la juda-kristana Malnova Testamento (unua parto de Biblio), kie Jakobo akiras la rajton de unuenaskiteco de sia plej aĝa frato Esavo interŝanĝe kun plado da lentoj. En la sekvo la dio mirakle favoras lin. (Genezo 25: 29-34) -vl

je penco la justan prezon de lia varo, kaj due tiu afero tute ne koncernas la laboriston B. Tio, kion B postulas kaj havas la rajton postuli, estas, ke la kapitalisto pagu al li la valoron de lia laborforto.

> „Ambaŭ gajnis ankoraŭ; la laboristo, ĉar oni antaŭpagis al li la fruktojn de lia laboro" (devas esti: la nepagitan laboron de aliaj laboristoj) „antaŭ ol ĝi estis farita," (devas esti: antaŭ ol lia propra donis fruktojn) „la entreprenisto, ĉar la laboro de tiu laboristo valoris pli ol lia salajro" (devas esti: produktis pli da valoro ol tiun de lia salajro).[39]

Sed la afero aspektas tute alia, se ni konsideras la kapitalisman produktadon en seninterrompa fluo de ĝia renoviĝo kaj rigardas, anstataŭ la unuopan kapitaliston kaj la unuopan laboriston, la kapitalistan klason kaj fronte al ĝi la laboristan klason. Sed per tio ni almetus mezuron kiu estas totale fremda al la varproduktado.

En la varproduktado staras unu fronte al la alia, sendepende unu de la alia, nur vendisto kaj aĉetisto. Iliaj reciprokaj rilatoj finiĝas kun la findato de ilia kontrakto. Se la afero ripetiĝas, tiam pro nova kontrakto, kiu neniel rilatas kun la antaŭa kaj ĉe kiu nur hazardo kunigas la saman aĉetanton kun la sama vendanto.

Se oni do volas prijuĝi la varproduktadon, aŭ okazaĵon kiu apartenas al ĝi, laŭ ĝiaj propraj ekonomiaj leĝoj, tiam ni devas konsideri ĉiun interŝanĝ-agon individue, ekster ĉia kunteksto kun la interŝanĝ-ago kiu antaŭis ĝin kiel kun tiu kiu sekvas al ĝi. Kaj ĉar aĉetoj kaj vendoj fariĝas nur inter unuopaj individuoj, tial ne taŭgas serĉi en ili rilatojn inter tutaj sociaj klasoj.

Kiom ajn longa estas la serio da periodaj reproduktadoj kaj antaŭaj akumuladoj, kiun la hodiaŭ funkcianta kapitalo trairis, ĝi konservas ĉiam sian originan virgecon. Tiom longe, kiom ĉe ĉiu unuopa interŝanĝ-ago – konsiderata individue – la leĝoj de interŝanĝoj estas respektataj, la alproprigmaniero povas suferi totalan ŝanĝegon, sen iel tuŝi la rajton je proprieto, kiu kongruas kun la varproduktado. Tiu sama rajto validas kiel ĉe la komenco, kie la produkto apartenas al la produktanto kaj kie tiu, interŝanĝante ekvivalenton kontraŭ ekvivalento, povas riĉiĝi nur per propra laboro, tiel ankaŭ en la kapitalisma periodo, kie la socia riĉaĵo en

39 Sismondi, l.c., p. 135. (*En la originalo:* „Tous deux gagnaient encore; l'ouvrier parce qu'on lui avançait les fruits de son travail" (devas esti: du travail gratuit d'autres ouvriers) „avant qu'il fût fait;" (devas esti: avant que le sien ait porté de fruit) „le maître, parce que le travail de cet ouvrier valait plus que le salaire" (devas esti: produisait plus de valeur que celle de son salaire).

ĉiam kreskanta mezuro fariĝas la proprieto de tiuj, kiuj kapablas ĉiam denove alproprigi al si la nepagitan laboron de aliuloj.

Tiu rezulto fariĝas neevitebla, ekde kiam la laborforto estas de la laboristo mem libere vendata kiel varo. Sed ankaŭ nur ekde tiam la varproduktado ĝeneraliĝas kaj fariĝas tipa formo de produktado; nur ekde tiam ĉiu produkto estas produktata apriore por la vendo kaj ĉia produktita riĉaĵo trairas la cirkuladon. Nur tie, kie la dunglaboro estas ĝia bazo, la varproduktado trudiĝas al la tuta socio; sed ankaŭ nur tie ĝi disvolvas ĉiujn siajn kaŝitajn kapablojn. Diri, ke la interveno de dunglaboro falsas la varproduktadon, signifas diri, ke la varproduktado, se ĝi volas resti nefalsita, ne rajtas evolui. En la sama mezuro, laŭ kiu ĝi plu evoluas laŭ siaj propraj imanentaj leĝoj al kapitalisma produktado, en la sama mezuro la proprietleĝoj de la varproduktado transformiĝas en leĝojn de la kapitalisma alproprigo.[40]

Ni vidis, ke eĉ ĉe simpla reproduktado ĉio antaŭpagita kapitalo, kiel ajn ĝi estas origine akirita, transformiĝas en akumulitan kapitalon aŭ kapitaligitan plusvaloron. Sed entute ĉia origine antaŭpagita kapitalo perdiĝas kiel guteto en la fluego de la produktado (*magnitudo evanescens* en la matematika senco), kompare kun la rekte akumulita kapitalo, do la plusvaloro aŭ plusprodukto retransformita en kapitalon, egale ĉu ĝi funkcias en la mano kiu akumulis ĝin aŭ en fremda mano. La politika ekonomio prezentas la kapitalon entute kiel „akumulitan riĉaĵon" (transformitan plusvaloron aŭ enspezon [*revenue*]), „kiu estas denove uzata por nova produktado de plusvaloro"[41], aŭ ankaŭ la kapitaliston kiel „posedanton de la plusprodukto".[42] La sama vidmaniero posedas nur alian formon en la esprimo, ke ĉia ekzistanta kapitalo estas akumulita aŭ kapitaligita intere-

40 Pro tio oni admiru la ruzecon de Prudono, kiu volas forigi la kapitalisman proprieton per tio, ke li respektigas al ĝi la eternajn proprietleĝojn de la varproduktado!

*En la franca eldono:* „Do, kia iluzio, tiu de certaj socialistaj skoloj, kiuj imagas povi rompi la reĝimon de la kapitalo aplikante al ĝi la eternajn leĝojn de la varproduktado!" -vl

41 „Kapitalo estas akumulita riĉaĵo, uzata por akiri profiton." (Malthus, l.c., [p. 262]) „Kapitalo … konsistas el riĉaĵo, ŝparita el la enspezo [*revenue*] kaj uzata por akiri profiton." (R. Jones, *„Text-book of lectures on the Political Economy of Nations"*, Hertford, 1852, p. 16)

42 „La posedantoj de la plusprodukto aŭ de kapitalo." (*„The Source and Remedy of the National Difficulties. A Letter to Lord John Russell"*, Londono, 1821, [p. 4])

zo, ĉar la interezo estas nur frakcio de la plusvaloro.[43]

## 2. Erara interpreto de la reproduktado je etendita skalo flanke de la politika ekonomio

Antaŭ ol pli detale esplori la akumuladon aŭ retransformadon de plusvaloro en kapitalon, necesas forigi ambiguecon elkovitan de la klasika ekonomio.

Same kiel la varoj, kiujn la kapitalisto aĉetas per parto de la plusvaloro por sia propra konsumado, ne servas al li kiel produktad- kaj plivalorigrimedoj, tiel la laboro, kiun li aĉetas por kontentigi siajn naturajn kaj sociajn bezonojn, ne estas produktiva laboro. Anstataŭ transformi per la aĉeto de tiuj varoj kaj laboro la plusvaloron en kapitalon, li konsumas aŭ elspezas ĝin, male, kiel enspezon [*revenue*]. Fronte al la vivmaniero de la feŭda nobelaro, kiu, kiel Hegelo prave diras, „konsistas en konsumado de la ekzistanto” kaj disvastiĝas nome ankaŭ en la lukso de personaj servoj, por la burĝa ekonomio decide gravis anonci la akumuladon de la kapitalo kiel unuan civitanan devon kaj senĉese prediki: oni povas akumuli nenion, se oni formanĝas la tutan enspezon [*revenue*], anstataŭ elspezi bonan parton da ĝi por dungado de kromaj produktivaj laboristoj, kiuj gajnigas pli ol kostas. Aliflanke ĝi devis polemiki kontraŭ la popola antaŭjuĝo, kiu konfuzas la kapitalisman produktadon kun trezorestigo[44] kaj pro tio kredas, ke akumulita riĉaĵo estas riĉaĵo kiu estas savita kontraŭ detruiĝo en sia ekzistanta naturformo, do esti konsumita, aŭ ankaŭ savita kontraŭ la cirkulado. Malebligi la monon cirkuli estus ĝuste la malo de ĝia plivalorigo kiel kapitalo, kaj varakumulado en trezoriga senco estus pura stultaĵo.[45] Grandamasa akumulado de varoj estas rezulto de cirkulad-

43 „Kapitalo, kun la kunmetita interezo sur ĉiu parto de la ŝparita kapitalo, tiom grandiĝas ke la tuta riĉaĵo de la mondo, el kiu venas enspezo, jam delonge fariĝis interezo de kapitalo.” (*Economist*, Londono, 19-a de julio 1851)

44 „Neniu ekonomikisto de la nuntempo povas kompreni sub ŝpari nur trezorestigon: kaj sendepende de tiu mallongigita kaj nesufiĉa procedo oni povas imagi nenian alian uzon de tiu esprimo koncerne la nacian riĉaĵon ol tiun, kiu devas rezulti el la diversa uzado de la ŝparitaĵo kaj kiu baziĝas sur reala distingo inter la diversaj manieroj de laboro kiuj estas de ĝi daŭrigataj.” (Malthus, l.c., p. 38, 39)

45 Ekz-e ĉe Balzako, kiu estis ĝisfunde studinta ĉiajn nuancojn de avareco, la maljuna uzuristo Gobseck estas jam infaniĝinta, kiam li komencas starigi trezoron el stakitaj varoj.

ŝtopiĝo aŭ de superproduktado.[46] Tamen en la popola imago impresas unuflanke la malrapide konsumataj havaĵoj de la konsumfonduso de la riĉuloj, kaj aliflanke la stokejoj de provizado, fenomeno kiu apartenas al ĉiuj produktadmanieroj kaj ĉe kiu ni restu momenton, kiam ni analizas la cirkuladprocezon.

La klasika ekonomio do pravas emfazante la konsumadon de plusvaloro per produktiva laboro anstataŭ per neproduktiva kiel karakterizan elementon de la akumuladprocezo. Sed tie komenciĝas ankaŭ ĝia eraro. A. Smith kreis la modon prezenti la akumuladon nur kiel konsumadon de la plusprodukto per produktivaj laboristoj aŭ la kapitaligon de la plusvaloro kiel ties nuran transformadon en laborforton. Ni aŭdu ekz-e Ricardo-n:

> „Oni devas kompreni, ke ĉiuj produktoj de lando estas konsumataj; sed estas la plej granda pensebla diferenco, ĉu ili estas konsumataj per tiuj, kiuj reproduktas alian valoron, aŭ per tiuj, kiuj ne reproduktas ĝin. Kiam ni diras, ke enspezo [*revenue*] estas ŝparata kaj aldonita al la kapitalo, tiam ni celas, ke la parto de la enspezo, pri kiu oni diras ke ĝi estas aldonita al la kapitalo, estas konsumata de produktivaj anstataŭ de neproduktivaj laboristoj. Ne ekzistas pli granda eraro ol supozi ke kapitalo estas pliigata per nekonsumo."[47]

Ne ekzistas pli granda eraro ol tiu, kiun Ricardo kaj ĉiuj postaj gurdadis laŭ A. Smith, ke

> „la parto de la enspezo [*revenue*], pri kio oni diras, ke ĝi estas aldonita al la kapitalo, estas konsumata de produktivaj laboristoj".

Laŭ tiu imago, ĉia plusvaloro, kiu estas transformata en kapitalon, fariĝus varia kapitalo. Pli ĝuste ĝi dividiĝas, kiel la origine antaŭpagita valoro, en konstantan kapitalon kaj varian kapitalon, en produktadrimedojn kaj laborforton. Laborforto estas la formo, en kiu la varia kapitalo ene de la produktadprocezo ekzistas. En tiu procezo ĝi mem estas konsumata de la kapitalisto. Ĝi konsumas per sia funkciado – la laboro – produktadrimedojn. Samtempe la mono pagita per la aĉeto de la laborforto transformiĝas en vivrimedojn, kiuj estas konsumataj ne de la „produktiva laboro", sed de la „produktiva laboristo". A. Smith venas el tute malĝusta analizo al la absurda rezulto ke, kvankam ĉia individua kapitalo dividiĝas en konstantan kaj viarian parton, la socia kapitalo dissolviĝas nur en varian kapitalon aŭ estas elspezata nur en pago de salajro. Ekz-e ŝtof-

46 „Akumulado de kapitaloj … ĉeso de interŝanĝo … superproduktado." (Th. Corbet, l.c., p. 104)

47 Ricardo, l.c., p. 163, noto.

fabrikisto transformas 2.000 pundojn en kapitalon. Li elspezas parton de la mono en aĉeto de teksistoj, la alian en lanfadeno, lanmaŝinaro ktp. Sed la homoj, de kiuj li aĉetas la fadenon kaj la maŝinaron, pagas siavice per parto de ĝi laboron ktp ĝis kiam la tutaj 2.000 pundoj estas elspezitaj en pago de salajro aŭ la tuta produkto reprezentata de la 2.000 pundoj estas konsumita de produktivaj laboristoj. Ni vidas: la tuta pezo de la argumento kuŝas en la vorto „ktp", kiu sendas nin de unu punkto al alia. Efektive, A. Smith ĉesigas sian esploradon ĝuste tie, kie la malfacilaĵo komenciĝas.[48]

Se oni konsideras nur la fonduson de la tuta jarproduktado, tiam la jara reproduktadprocezo estas facile komprenebla. Sed ĉiuj elementoj de la jarproduktaĵo estas surmerkatigendaj, kaj tie komenciĝas la malfacilaĵo. La moviĝo de la unuopaj kapitaloj kaj de la personaj enspezoj [*revenues*] kruciĝas, miksiĝas, perdiĝas en ĝenerala lokŝanĝado – la cirkulado de la socia riĉaĵo –, kiu konfuzas la rigardon kaj donas al la esplorado tre komplikajn taskojn por solvi. En la tria sekcio de la dua libro mi donos la analizon de la reala fenomeno. – Estas la granda merito de la fiziokratoj, ke ili en sia *Tableau économique* por la unua fojo provis doni bildon pri la jarproduktado en la formo, en kiu ĝi eliras el la cirkulado.[49]

Cetere estas memkompreneble, ke la politika ekonomio ne maltrafis, en la intereso de la kapitalista klaso, ekspluati la doktrinon de Adam Smith: ke la tuta parto de la neta produkto, transformita en kapitalon, estas konsumata de la laborista klaso.

---

48 Malgraŭ sia „logiko" s-ro J. St. Mill nenie rimarkas eĉ nur tian analiz-eraron, kiuj eĉ ene de la burĝa horizonto, el pure fakeca vidpunkto, krias por korekto. Ĉie li registras kun dogmemo de lernejano la pensajn konfuzaĵojn de siaj majstroj. Ankaŭ ĉi tie: „En longa perspektivo, la kapitalo dissolviĝas mem komplete en salajron, kaj kiam ĝi estas per vendo de la produkto anstataŭigita, ĝi refariĝas salajro."

49 A. Smith, en sia prezentado de la reproduktadprocezo, do ankaŭ de la akumulado, faris plurrilate ne nur neniajn progresojn, sed decidajn malprogresojn kompare kun liaj antaŭuloj, nome la fiziokratoj. Kun lia en la teksto menciita iluzio rilatas ankaŭ la vere fabela dogmo, kiun li heredigis al la politika ekonomio, ke la prezo de la varoj konsistas el salajro, profito (inkluzive de interezo) kaj grundrento, do nur el salajro kaj plusvaloro. Elirante de tiu bazo, almenaŭ Storch konfesas naive: „Maleblas dissolvi la necesan prezon en ĝiajn plej simplajn elementojn." (Storch, l.c., Petersburgo, eld. 1815, vol. II, p. 141, noto) Jen bela ekonomia scienco, kiu deklaras malebla dissolvi la prezon de la varoj en ĝiajn plej simplajn elementojn! La detaloj pri tio ĉi estos diskutataj en la 3-a sekcio de la Dua kaj en la 7-a sekcio de la Tria Libro.

# 3. Divido de la plusvaloro en kapitalon kaj enspezon *[*revenue*]*. La abstinencteorio

En la antaŭa ĉapitro ni rigardis la plusvaloron resp. la plusprodukton, nur kiel individuan konsumfonduson de la kapitalisto, en tiu ĉi ĉapitro ĝis nun nur kiel akumuladfonduson. Sed ĝi estas nek nur unu nek nur la alia, sed ambaŭ samtempe. Parto de la plusvaloro estas konsumata de la kapitalisto kiel enspezo[50], alia parto aplikata aŭ akumulata kiel kapitalo.

Kun donita kvanto de la plusvaloro unu el tiuj partoj estas des pli granda, ju pli malgranda estas la alia. Se oni konsideras ĉiajn aliajn cirkonstancojn senŝanĝaj, la proporcio, en kiu tiu divido okazas, estas la grando de akumulado. Sed tiu, kiu faras tiun dividon, estas la proprietulo de la plusvaloro, la kapitalisto. Ĝi estas do lia vol-ago. Oni diras pri la parto de lia enspezita tributo, kiun li akumulas, ke li ŝparas ĝin, ĉar li ne formanĝas ĝin, t.e. ĉar li plenumas sian funkcion kiel kapitalisto, nome la funkcion sin riĉigi.

Nur en la mezuro, en kiu la kapitalisto estas personigita kapitalo, li havas historian valoron kaj tiun historian ekzistorajton, kiu, kiel la sprita Lichnovski diras, *nenijan daton ne havas*. Nur en tiu mezuro lia propra transira neceso troviĝas en la transira neceso de la kapitalisma produktad-maniero. Sed en tiu mezuro lia motivo, kiu igas lin agi, estas ne uzvaloro kaj ĝuo, sed interŝanĝvaloro kaj ties pliigo. Kiel fanatikulo de plivalorigo de la valoro li senrespekte devigas la homaron al produktado pro la produktado, do al disvolvado de la sociaj produktadfortoj kaj al kreado de materiaj produktadkondiĉoj, kiuj sole povas fariĝi la reala bazo de pli alta sociformo, kies baza principo estas la plena kaj libera evoluo de ĉiu individuo. Nur kiel personigo de la kapitalo li estas respektinda. Kiel tia li dividas kun la trezorigisto la absolutan riĉiĝinstinkton. Sed kio ĉe tiu aperas kiel individua manio, estas ĉe la kapitalisto la efiko de la socia meĥanismo, en kiu li estas nur rado de la radaro. Krome la evoluo de la

50 La leganto certe rimarkas, ke la vorto *enspezo* [en la originalo: Revenue -vl] estas uzata en duobla senco, unue por signi la plusvaloron kiel periode el la kapitalo fontanta frukto, due por signi la parton de tiu frukto, kiun la kapitalisto periode konsumas aŭ aldonas al sia konsumfonduso. Mi konservas tiun duoblan sencon, ĉar ĝi harmonias kun la lingvouzo de la anglaj kaj francaj ekonomikistoj [*revenue* -vl].

kapitalisma produktado necesigas konstantan pliigon de en industri-entrepreno investita kapitalo, kaj la konkurenco trudas al ĉiu individua kapitalisto la imanentajn leĝojn de la kapitalisma produktadmaniero kiel eksterajn devigajn leĝojn. Ĝi devigas lin konstante ampleksigi sian kapitalon por konservi ĝin, kaj ampleksigi ĝin li povas nur per progresa akumulado.

En la mezuro, en kiu lia agdo estas nur funkcio de la kapitalo dotita en li per volo kaj konscio, li konsideras sian privatan konsumon kiel rabo je la akumulado de la kapitalo, kiel en la duobla librotenado privataj elspezoj de la kapitalisto estas skribitaj en la rubrikon de ŝuldoj de la kapitalisto, kiujn li ŝuldas al la kapitalo. La akumulado estas konkero de la mondo de socia riĉaĵo. Ĝi etendas kun la kvanto de la ekspluatata hommaterialo samtempe la rektan kaj malrekt an dominadon de la kapitalisto.[51]

51 En la eksmoda, kvankam ĉiam renoviĝanta, formo de la kapitalisto, en la uzuristo, Lutero tre bone ilustras la despotemon kiel elementon de la riĉiĝ-instinkto. „La paganoj povis konkludi el la racio, ke uzuristo estas kvarobla ŝtelisto kaj murdisto. Sed ni kristanoj tiom honoras ilin, ke ni rekte adoras ilin pro ilia mono … Kiu elsuĉas, rabas kaj ŝtelas aliies nutraĵon, tiu faras same grandan murdon (en tio kio koncernas lin) kiel tiu kiu mortigas iun per malsato kaj tute ruinigas lin. Kaj ĝuste tion faras uzuristo, kaj dume sidas trankvile sur sia seĝo, kvankam li pli ĝuste devus pendi ĉe la pendumilo, kaj esti manĝata de tiom da korvoj kiom li ŝtelis da guldenoj, se li havus almenaŭ tiom da karno ke tiom da korvoj povus ĉiu ricevi sian pecon. Dume oni pendumas la ŝteletintojn … Ŝteletintoj kuŝas kaptite en fero, ŝtelegistoj promenas en oro kaj silko … Do, ne estas pli granda malamiko de la homo surtere (post la diablo) ol avarulo kaj uzuristo, ĉar li volas esti dio super ĉiuj homoj. Turkoj, militistoj, tiranoj estas ankaŭ maliculoj, sed tiuj devas lasi la homojn vivi kaj konfesi ke ili estas malbonuloj kaj malamikoj. Kaj ili povas, ja kelkfoje certe devas kompati aliulojn. Sed kiu estas uzuristo kaj avarulo, tiu volas ke ĉiuj pro li devus perei en malsato kaj soifo, funebro kaj mizero, se dependas de li, por ke li havu ĉion sole, kaj ĉiu ricevu de li kiel de sia dio kaj estu eterne lia servutulo. Porti puntaĵojn, orajn ĉenojn kaj ringojn, viŝi al si la buŝon, esti konsiderata kiel kara, pia homo kaj glorata … Uzuro estas granda monstro, kiel ogro kiu ĉion ruinigas, pli ol ia ajn Kako, Gerio aŭ Anteo. Kaj tamen ornamas sin kaj pretendas esti pia, por ke neniu vidu, kien venas la bovoj, kiujn li retroe tiras en sian truon. Sed Herkulo aŭdos la blekojn de la bovoj kaj la ĝemojn de la kaptitoj kaj serĉos Kakon eĉ inter klifoj kaj rokoj kaj liberigos la bovojn el la malbonulo. Ĉar Kako nomiĝas malbonulo, kiu estas pia uzuristo, ŝtelas, rabas, voras ĉion. Kaj tamen asertas ke li ne faris tion, kaj volas ke neniu trovu tion, ĉar la bovoj estis tiritaj en lian truon retroe kaj donas aspekton kaj spurojn kvazaŭ ili estus eligitaj. Tiel la uzuristo volas ankaŭ trompi la mondon, kvazaŭ li utilus kaj donus bovojn al la mondo, kvankam li ja tiras ilin sole al si kaj voras ilin … Kaj kiel oni radumas kaj

Sed la prapeko efikas ĉie. Kun la evoluo de la kapitalisma produktadmaniero, de la akumulado kaj de la riĉaĵo, la kapitalisto ĉesas esti nura enkarniĝo de la kapitalo. Li sentas „homan emocion" por sia propra Adamo kaj fariĝas tiom klera ke li priridetas la fervoron por asketismo kiel antaŭjuĝon de la eksmoda trezorigisto. Dum la klasika kapitalisto brulmarkas la individuan konsumon kiel pekon kontraŭ lia funkcio kaj „konservado" de la akumulado, la moderniĝinta kapitalisto kapablas kompreni la akumuladon kiel „sindeteno je la ĝuinstinkto". „Du animoj loĝas, ve! en mia brusto, unu volas disiĝi de la alia!"[52]

En la historiaj komencoj de la kapitalisma produktadmaniero – kaj ĉiu kapitalisma parvenuo trairas tiun historian stadion individue – antaŭregas riĉiĝinstinkto kaj avareco kiel absolutaj pasioj. Sed la progreso de la kapitalisma produktado kreas ne nur mondon de ĝuoj. Ĝi malfermas kun la spekulado kaj la kreditsistemo mil fontojn de subita riĉiĝo. Sur certa evolunivelo konvencia grado de malŝparo, kiu estas samtempe elmontro de la riĉaĵo kaj pro tio kreditrimedo, fariĝas eĉ komerca neceso de la „malfeliĉa" kapitalisto. La lukso eniras la reprezentadkostojn de la kapitalo. Krome, la kapitalisto riĉigas sin ne kiel la trezorigisto, en proporcio al sia persona laboro kaj sia persona nekonsumado, sed laŭ la mezuro en kiu li elsuĉas fremdan laborforton kaj trudas al la laboristo rezignon pri ĉiaj vivĝuoj. Do, kvankam la malŝparo de la kapitalisto neniam posedas la senĝenan manieron de la feŭda sinjoro, kvankam en la fono embuskas ĉiam plej fia avareco kaj timema kalkulado, tamen kreskas lia malŝparo kun lia akumulado, sen ke lia akumulado estas nepre malhelpata de la elspezo, nek inverse. Per tio samtempe evoluas en la brusto de la kapitalisto faŭsteca konflikto inter akumulad- kaj ĝu-instinkto.

> „La industrio de Manĉestro", tiel en skribaĵo kiun d-ro Aikin publikigis en la jaro 1795, „divideblas en kvar periodojn. En la unua la fabrikistoj estis devigataj forte labori por sia vivteno."

Ili riĉigis sin speciale per priŝtelado de la gepatroj, kiuj konfidis al ili siajn knabojn kiel lernantojn kaj por tio devis multe pagi, dum la lernantoj estis malsatigataj. Aliflanke la mezumaj salajroj estis malaltaj, kaj la akumulado postulis grandan ŝparadon. Ili vivis kvazaŭ trezorigistoj kaj konsumis multe malpli ol la interezojn de sia kapitalo.

---

senkapigas la vojrabistojn, murdistojn kaj domrabistojn, kiom des pli oni devus radumi kaj mortigi … forpeli, malbeni kaj senkapigi ĉiujn uzuristojn." (Martin Luther [Marteno Lutero], l.c.)

52 Vd Goeto: Faŭsto.

> „En la dua periodo ili komencis akiri etajn havaĵojn, sed laboris same streĉe kiel antaŭe”, ĉar la rekta ekspluatado de laboro kostas laboron, kiel ĉiu sklavpelisto scias, „kaj vivis en la sama simpla maniero kiel antaŭe …
>
> En la tria periodo komenciĝis la lukso, kaj la afero estis etendata per elsendo de rajdistoj” (rajdantaj vojaĝ-komizoj) „por serĉi mendojn en ĉiu bazarurbo de la reĝlando. Verŝajne antaŭ 1690 ekzistis malmultaj aŭ neniaj kapitaloj de 3.000 ĝis 4.000 sterlingaj pundoj akiritaj en la industrio. Sed en tiu epoko aŭ iomete poste la industriistoj estis jam akumulintaj monon kaj komencis konstrui ŝtonajn domojn anstataŭ tiujn el ligno kaj mortero … Ankoraŭ en la unuaj jardekoj de la 18-a jarcento, manĉestra fabrikisto, kiu regalintus siajn gastojn per pindo da eksterlanda vino, elmetintus sin al komentoj kaj kapskuoj de ĉiuj siaj najbaroj.”

Antaŭ la apero de la maŝinoj, la konsumado de la fabrikistoj, vespere en la tavernoj kie ili kunvenis, estis neniam pli alta ol ses d. por glaso da punĉo kaj 1 d. por rulaĵo da tabako. Nur en 1758, kaj tio estas epokfara, oni vidis „personon vere engaĝitan en la komerco kun propra ekipaĵo!” „La kvara periodo”, la lasta triono de la 18-a jarcento, „estas tiu de granda lukso kaj malŝparo, subtenataj de la etendiĝo de la komerco.”[53] Kion dirus la bona d-ro Aikin, se li nuntempe resurektus en Manĉestro!

Akumulu, akumulu! Jen la plej alta ordono! „La industrio liveras la materialon, kiun la ŝparado akumulas.”[54] Do, ŝparu, ŝparu, t.e. retransformu kiom eble plej grandan parton de la plusvaloro aŭ plusprodukto en kapitalon! Akumulado por akumulado, produktado por produktado, en tiu formulo la klasika ekonomio elparolis la historian mision de la burĝa periodo. Ĝi en neniu momento iluziiĝis pri la naskodoloroj de la riĉaĵo[55], sed kion utilas la lamentado pri la historia neceso? Sed se la klasika ekonomio konsideras la proleton nur kiel maŝinon por produktado de plusvaloro, el tiu vidpunkto la kapitalisto estas ankaŭ nur maŝino por transformado de plusvaloro en kapitalon. Ĝi prenas lian historian funkcion ege serioze. Por ŝirmi lian bruston kontraŭ la katastrofa konflikto inter ĝuinstinkto kaj riĉiĝinstinkto, Malthus, komence de la dudekaj jaroj de tiu ĉi jarcento, defendis sistemon de labordivido kiu atribuas al la

---

53 Dr. Aikin, „*Description of the Country from 30 to 40 miles round Manchester*”, Londono, 1795, p. [181], 182 sj, [188].

54 A. Smith, l.c., vol. II, ĉap. III, [p. 367].

55 Eĉ J. B. Say diras: „La ŝparaĵoj de la riĉuloj estas farataj surkoste de la malriĉuloj.” „La roma proleto vivis preskaŭ tute surkoste de la socio … Oni povus preskaŭ diri, ke la moderna socio vivas surkoste de la proletoj, de tiu parto, kiun ili forprenas de ili el la rekompenco de la laboro.” (Sismondi, „*Études etc.*”, vol. I, p. 24)

kapitalisto vere engaĝiĝinta en la produktado la taskon akumuli, kaj al la aliaj partoprenantoj en la plusvaloro, al la kampara aristokrataro, al la ŝtataj kaj ekleziaj altaj funkciuloj ktp, la taskon malŝpare elspezi. Estas plej grave, diras li, „teni la pasion elspezi kaj la pasion akumuli distingitaj”.[56] La sinjoroj kapitalistoj, delonge transformiĝintaj en bonvivulojn kaj mondumulojn, laŭte protestis. Kio, kontestis unu el iliaj porparolantoj, rikardano, s-ro Malthus predikas altajn grundrentojn, altajn impostojn ktp, por premi al la industriuloj konstantan spronon per neproduktivaj konsumantoj! Tamen, produktado, produktado je ĉiam pli alta skalo, jen la devizo, sed

> „Produktado estas per tia procezo multe pli malhelpata ol helpata. Ankaŭ ne estas tute juste (*nor is it quite fair*), teni nombron da personoj tiel en nenifarado, nur por pinĉi aliajn, el kies karaktero oni rajtas konkludi (*who are likely from their characters*), ke, se vi povas devigi ilin funkcii, ili sukcese funkcias.”[57]

Sed se tiu rikardano trovas maljuste, sproni la industrian kapitaliston al akumulado per tio ke oni ĉerpas la kremon de lia lakto, li aliflanke kredas necese, limigi la enspezon de la laboristo laŭeble al la minimuma salajro, „por teni lin laborema”. Li ankaŭ eĉ ne momenton kaŝas, ke alproprigo de nepagita laboro estas la sekreto de la plusfarado.

> „Plia postulo de laboro flanke de la laboristoj signifas nenion alian ol ilia preteco preni malpli el sia propra produkto por si mem, kaj lasi pli grandan parton da ĝi al siaj dungistoj; kaj se oni diras, ke malpliigo de la konsumado de la laboristo kondukas al tiel nomata *glut* (ŝtopiĝo de la merkato, superproduktado), mi povas respondi nur ke *glut* sinonimas kun grandaj profitoj.”[58]

La erudicia disputo, kiel plej bone distribui la predon elpumpitan el la laboristo, inter industria kapitalisto kaj nenifara grundproprietulo ktp, ĉesis antaŭ la julia revolucio. Mallonge poste la urba proletaro sonorigis la alarmsonorilojn en Liono kaj la kampara proletaro flugigis la ruĝan kokon[59] en Anglio. En Britio disvastiĝis la ovenismo, sur la kontinento la sentsimonismo kaj furierismo. Tiam la vulgarekonomiko kaptis la okazon. Ĝuste jaron antaŭ ol Nassau W. Senior en Manĉestro eltrovis, ke la profito (inkluzive de interezo) de la kapitalo estas la produkto de la

56 Malthus, l.c., p. 319, 320.

57 *„An Inquiry into those principles respecting the Nature of Demand etc.”*, p. 67.

58 Saml., p. 59.

59 *Flugigi la ruĝan kokon*, esprimo (vaste uzta dum la kampula revolucio en Germanio kontraŭ la feŭdaj sinjoroj) por *fajrigi la domojn de la mastroj*. -vl

nepagata „lasta dekduhora laborhoro”, li anoncis al la mondo alian malkovron. „Mi”, diris li solene, „mi anstataŭigas la vorton kapitalo, konsiderata kiel produktadinstrumento, per la vorto abstinenco (abstinado).”[60] Jen nesuperita modelo de la „malkovroj” de la vulgarekonomiko! Ĝi anstataŭigas ekonomian kategorion per lakea frazo. Jen ĉio. „Kiam la sovaĝulo”, docentas Senior, „fabrikas pafarkojn, tiam li praktikas industrion, sed ne abstinencon.” Tio klarigas al ni, kiel kaj kial en pli fruaj sociaj kondiĉoj oni „sen la abstinenco” de la kapitalisto fabrikis laborilojn. „Ju pli la socio progresas, des pli da abstinenco ĝi postulas”[61], nome de tiuj, kiuj praktikas la industrion alproprigi al si la fremdan industrion kaj ties produkton. Ĉiuj kondiĉoj de la laborprocezo transformiĝas de nun en same multajn abstinencpraktikojn de la kapitalisto. Ke greno estas ne nur manĝata, sed ankaŭ semata, jen abstinenco de la kapitalisto! Ke la vino ricevas la tempon por finfermenti, jen abstinenco de la kapitalisto![62] La kapitalisto prirabas sin mem, se li „pruntas (!) la produktadinstrumentojn al la laboristo”, alivorte plivalorigas ilin kiel kapitalon per enkorpigo de la laborforto, anstataŭ formanĝi vapormaŝinojn, kotonon, fervojojn, sterkaĵon, tirĉevalojn ktp aŭ, kiel la vulgarekonomikisto infanece imagas, fordiboĉi „ilian valoron” en lukso kaj aliaj konsumrimedoj.[63] Kiel la kapitalista klaso tion sukcesu, tio estas sekreto ĝis nun obstine kaŝita de la vulgarekonomiko. Mallonge, la

60 Senior, „Principes fondamentaux de l’Écon. Pol.”, trad. Arrivabene, Parizo, 1836, p. 309. Tio estis al la disĉiploj de la malnova klasika skolo tamen tro forta. „S-ro Senior subŝovas al la esprimo laboro kaj kapitalo la esprimon laboro kaj abstinenco … Abstinenco estas nura negacio. Ne estas la abstinenco, sed la uzado de la produktive aplikata kapitalo, kiu konsistigas la fonton de la profito.” (John Cazenove, l.c., p. 130, noto) S-ro John St. Mill, male, kopias sur unu paĝo la profitteorion de Ricardo kaj sur la alia li aneksas la *„remuneration of abstinence*” [rekompenco pro abstinenco]. Kiel al li fremdas la hegela „kontraŭdiro”, la fonto de ĉia dialektiko, tiel li hejmas en plataj kontraŭdiroj.

Aldono al la 2-a eldono: La vulgarekonomikisto neniam faris la simplan penson, ke ĉia homa ago povas esti komprenata kiel „sindeteno”, „abstinenco” de ĝia malo. Manĝi estas abstinenco de fasti, iri abstinenco de stari, labori abstinenco de nenifaradi, nenifaradi abstinenco de labori ktp. La sinjoroj farus bone se ili foje pensus pri la diro de Spinozo: *Determinatio est negatio* [Limigo/determinado estas negacio].

61 Senior, l.c., p. 342, 343.

62 „Neniu … ekz-e semas sian tritikon kaj lasas ĝin kuŝi dum jaro en la grundo aŭ lasas sian vinon dum jaroj en la kelo, anstataŭ tuj konsumi tiujn aĵojn aŭ iliajn ekvivalentojn … se li ne atendus ricevi kroman valoron ktp.” (Scrope, *„Polit. Econ.”*, eld. de A. Potter, Novjorko, 1841, p. 133)

mondo vivas jam nur el la asketado de tiu moderna pentofaristo de Viŝnuo, de la kapitalisto. Ne nur la akumulado, la simpla „konservado de kapitalo postulas konstantan fortostreĉadon, por kontraŭstari la tenton formanĝi ĝin".[64] Do, la simpla humaneco evidente postulas elsavi la kapitaliston el martireco kaj tento, en la sama maniero, laŭ kiu la georgia sklavisto antaŭ nelonge, per forigo de la sklavismo, estis liberigita el la dolora dilemo, ĉu la plusprodukton elvipitan el la nigrula sklavo tute fordiboĉi en ĉampano aŭ ankaŭ parte retransformi ĝin en pli da nigruloj kaj pli da kampoj.

En la plej diversaj ekonomiaj sociaj formacioj okazas ne nur simpla reproduktado, sed, kvankam diversskale, reproduktado je etendita skalo. Estas progrese pli produktata kaj pli konsumata, do ankaŭ pli da produkto transformata en produktadrimedojn. Sed tiu procezo ne aperas kiel akumulado de kapitalo kaj do ankaŭ ne kiel funkcio de la kapitalisto, tiom longe kiom al la laboristo ne kontraŭstaras liaj laborrimedoj, do ankaŭ lia produkto ne en la formo de kapitalo.[65] La antaŭ kelkaj jaroj mortinta Richard Jones, posteulo de Malthus en la katedro de la politika ekonomio ĉe la orienthindia College en Haileybury, diskutas tion per du grandaj faktoj. Ĉar la plej multnombra parto de la hindia popolo konsistas el memmastrumantaj terkulturistoj, ilia produkto, iliaj labor- kaj viv-rimedoj ekzistas ankaŭ neniam „en la formo de fonduso ŝparata el fremda enspezo [*revenue*] (*saved from Revenue*) kaj pro tio trairis antaŭan procezon de akumulado (*a previous process of accumulation*)".[66] Aliflanke, en la

63 „La malhavo, kiun la kapitalisto trudas al si, per tio ke li pruntas siajn produktadrimedojn al la laboristo" (prunti estas eŭfemismo uzata de la vulgarekonomikista maniero por identigi la dunglaboriston ekspluatatan de la industria kapitalisto kun la industria kapitalisto mem, kiu pruntas monon de la monalprunta kapitalisto!), „anstataŭ dediĉi ilian valoron al sia propra uzado, per tio ke li transformas ilin en utilajn aŭ agrablajn objektojn." (G. de Molinari, l.c., p. 36)

64 „La conservation d'un capital exige … un effort … constant pour réister à la tentation de le consommer." (Courcelle-Seneuil, l.c., p. 20)

65 „La apartaj enspezoklasoj, kiuj plej abunde kontribuas al la progreso de la nacia kapitalo, ŝanĝiĝas sur diversaj ŝtupoj de sia evoluo kaj sekve estas tute diversaj ĉe nacioj, kiuj troviĝas en diversaj pozicioj en tiu evoluo … Profitoj … malgrava fonto de akumulado, kompare kun salajroj kaj rentoj, sur la pli fruaj ŝtupoj de la socio … Se konsiderinda kresko de la fortoj de la nacia industrio efektive okazis, la profitoj akiras kompare pli grandan gravecon kiel fonto de akumulado. (Richard Jones, „*Textbook etc*", p. 16, 21)

66 l.c., p. 36 sj. *Aldono al la 4-a eldono:* Verŝajne estas eraro, la tekstero ne estas

provincoj, kie la angla regado malplej dissolvis la malnovan sistemon, la nekampkulturaj laboristoj estas rekte laborigataj de la granduloj, al kiuj parto de kampkultura plusprodukto alfluas kiel tributo aŭ grundrento, alia parto estas de la laboristoj por ili transformata en luksaĵojn aŭ aliajn konsumrimedojn, dum la resto konsistigas la salajron de la laboristoj, kiuj estas proprietuloj de siaj laborinstrumentoj. Produktado kaj reproduktado je etendita skalo iras ĉi tie sian vojon sen ajna interveno de tiu moderna sanktulo, de tiu malĝojforma kavaliro, la kapitalisto „abstinulo”.

## 4. Cirkonstancoj, kiuj sendepende de la proporcia divido de la plusvaloro en kapitalon kaj enspezon determinas la amplekson de la akumulado: ekspluadgrado de la laborforto – produktadforto de la laboro – kreskanta diferenco inter aplikata kaj konsumata kapitalo – grando de la antaŭpagata kapitalo

Kun la supozo, ke la proporcio, laŭ kiu la plusvaloro fendiĝas en kapitalon kaj enspezon [*revenue*], estas donita, la grando de la akumulata kapitalo dependas evidente de la absoluta grando de la plusvaloro. Ni supozu ke 80 elcentoj estas kapitaligataj kaj 20 elcentoj formanĝataj, tiam la akumulata kapitalo estas 2.400 sterlingaj pundoj aŭ 1.200 pundoj, laŭ tio ĉu la ĉioma plusvaloro estis 3.000 aŭ 1.500 pundoj. Laŭ tio, ĉe la determinado de la grando de la akumulado kunefikas ĉiuj cirkonstancoj, kiuj determinas la kvanton de la plusvaloro. Ni resumas ilin ĉi tie refoje, sed nur en tio ke ili prezentas novajn vidpunktojn koncerne la akumuladon.

Ni memoru, ke la kvoto de plusvaloro dependas unuavice de la ekspluatgrado de la laborforto. La politika ekonomio honoras tiun rolon tiom, ke ĝi okaze identigas la akcelon de la akumulado per altigita produktadforto de la laboro kun ĝia akcelo per altigita ekspluatado de la laboristo.[67] En la sekcioj pri la produktado de la plusvaloro ni konstante

trovita. – F. E.

67 „Ricardo diras: ‘En diversaj stadioj de la socio la akumulado de la kapitalo aŭ

premisis, ke la salajro estas minimume egala al la valoro de la laborforto. La perforta malaltigo de la salajro sub tiu valoro ludas tamen en la praktika moviĝo tro gravan rolon por ne dum momento halti ĉe ĝi. Ĝi transformas fakte, ene de certaj limoj, la necesan konsumfonduson de la laboristo en akumuladfonduson de kapitalo.

> „Salajroj", diras J. St. Mill, „ne havas produktadforton; ili estas la prezo de produktadforto; salajroj ne kontribuas, apud la laboro mem, al la varproduktado, same kiel nek la prezo de la maŝinaro mem. Se laboro haveblus sen aĉeto, tiam salajroj estus superfluaj."[68]

Sed se laboristoj povus vivi de aero, tiam ili neniapreze aĉeteblus. Ilia nekostado estas do limo en la matematika senco, ĉiam neatingebla., kvankam ĉiam alproksimigebla. Estas la konstanta tendenco de la kapitalo premi ilin al tiu nihilisma starpunkto. Verkisto de la 18-a jarcento, kiun mi ofte citas, la aŭtoro de la „Essay on Trade and Commerce", perfidas nur la plej internan animsekreton de la angla kapitalo, kiam li deklaras la historia vivtasko de Anglio malaltigi la anglan salajron al la franca kaj la nederlanda nivelo.[69] Li diras i.a. naive:

> „Sed se niaj malriĉuloj" (esprimo por laboristoj) „volas vivi lukse … ilia laboro kompreneble devas esti multekosta … Oni rigardu nur la harstarigan amason da superfluaĵoj (heap of superfluities), kiujn niaj manufakturlaboristoj konsumas, ekzemple brandon, ĝinon, teon, sukeron, fremdajn fruktojn, fortan

---

de la rimedoj apliki laboron'" (signifas: ekspluati laboron) „'pli aŭ malpli rapida kaj devas en ĉiuj kazoj dependi de la produktadfortoj de la laboro. La produktadfortoj de la laboro estas ĝenerale plej grandaj, kie ekzistas abundo de fekunda grundo.' Se en tiu frazo la produktadfortoj de la laboro signifas la malgrandecon de la alikvota parto de ĉiu produkto kiun ricevas tiuj, kies manlaboro produktis ĝin, tiam la frazo estas taŭtologia, ĉar la restanta parto estas la fonduso, el kiu, se plaĉas al ĝia proprietulo (*if the owner pleases*), kapitalo akumuleblas. Sed tio plej ofte ne okazas, kie la tero estas plej fekunda." (*„Observations on certain verbal disputes ktp"*, p. 74)

68 J. St. Mill, *„Essays on some unsetteled Questions of Polit. Economy"*, Londono, 1844, p. 90, 91.

69 *„An Essay on Trade and Commerce"*, Londono, 1770, p. 44. Simile la *Times* publikigis en decembro 1866 kaj januaro 1867 verajn korelverŝojn de la anglaj proprietuloj de minejoj, en kiuj oni priskribis la feliĉan situacion de la belgaj minejlaboristoj, kiuj ne postulas pli kaj ne ricevas pli ol strikte necese por vivi por siaj „mastroj". La belgaj laboristoj devas multon suferi, sed aperi kiel modelaj laboristoj en la *Times*! La respondo estis komence de februaro 1867 la striko de la belgaj minejlaboristoj (ĉe *Marchienne*), subpremata per pulvo kaj plumbo.

> bieron, presitan linon, snuf- kaj fum-tabakon ktp.”[70]

Li citas la skribaĵon de fabrikisto de *Northamptonshire*, kiu lamentas kun ĉielen strabanta rigardo:

> „Laboro estas trionon pli malmultekosta en Francio ol en Anglio: ĉar la francaj malriĉuloj laboras streĉe kaj havas malmulte da nutraĵo kaj da vestaĵo, kaj ilia ĉefa konsumo estas pano, fruktoj, herboj, radikoj kaj sekigita fiŝo; ĉar ili manĝas tre malofte viandon, kaj kiam la tritiko estas multekosta, tre malmulte da pano.”[71] Kaj la eseisto daŭrigas: „aldoniĝas, ke ilia trinkaĵo konsistas el akvo aŭ el simile malfortaj likvoroj, tiel ke ili efektive elspezas mirige malmulan monon … Tia stato de la aferoj estas certe malfacile alkondukebla, sed ĝi ne estas neatingebla, kiel ĝia ekzisto same en Francio kiel en Holando pruvas.”[72]

Du jardekojn poste, usonano, la baronigita jankio Benjamin Thompson (alinome grafo Rumford), sekvis la saman linion de homamo kun granda ĝojo de Dio kaj de homoj. Liaj „eseoj” estas kuirlibro kun ĉiaj receptoj por anstataŭigi la multekostajn normalajn manĝaĵojn de la laboristo per surogatoj. Aparte sukcesinta recepto de tiu stranga „filozofo” estas jena:

> „Kvin funtoj da hordeo, kvin funktoj da maizo, por 3 pencoj haringoj, 1 penco da salo, 1 penco da vinagro, 2 pencoj da pipro kaj herboj – sume de 20 3/4 pencoj donas supon por 64 homoj, eĉ ĉe la mezumaj prezoj de greno la manĝaĵo malaltigeblas al 1/4 penco pokape” (eĉ ne 3 pfenigoj [1,5 centonoj da eŭro -vl].[73]

---

70 l.c., p. 44, 46.

71 La fabrikisto de *Northamptonshire* faras pro sia korimpulso senkulpigeblan pian trompon [*pia fraus*]. Li pretendas kompari la vivon de anglaj kaj francaj manufakturlaboristoj, sed li priskribas, kiel en sia konfuzo li poste mem konfesas, per la ĵus cititaj vortoj francajn kampkulturajn laboristojn!

72 l.c., p. 70, 71. *Noto al la tria eldono:* Hodiaŭ, danke al la mondmerkata konkurenco, estigita de tiam, ni ankoraŭ bone progresis. „Se Ĉinio”, deklaras la parlamentano Stapleton al siaj elektantoj, „se Ĉinio fariĝas granda industrilando, tiam mi ne vidas, kiel la eŭropa laborista loĝantaro povas elteni la batalon, sen malsupriĝi al la nivelo de siaj konkurencantoj.” (*Times*, 3-a de septembro 1873) – Jam ne nur kontinentaj, ne, ĉinaj salajroj, jen la sopirata celo de la angla kapitalo.

73 Benjamin Thompson, „Essays, political, economical, and philosophical ktp”, 3 vol., Londono, 1796-1802, vol. 1, p. 294. En sia „The State of the Poor, or an History of the Labouring Classes in England ktp”, Sir F. M. Eden rekomendas la almozsupon de Rumford al la prezidantoj de aziloj kaj admonas la anglajn laboristojn riproĉe, ke „ĉe la skotoj ekzistas multaj familioj, kiuj

Kun la progreso de la kapitalisma produktado la varfalsado superfluigis la idealojn de Thompson.[74]

Fine de la 18-a kaj dum la unuaj jardekoj de la 19-a jarcento la anglaj farmistoj kaj kamparaj lordoj trudis la absolutan minimumsalajron, per tio ke ili pagis al la kampkulturaj taglaboristoj malpli ol la minimumon en formo de salajro, kaj la reston en formo de pastrej-subteno. Jen ekzemplo de la burleska humuro per kiu ili fiksis la „laŭleĝan” salajrotarifon:

> „Kiam la skviroj fiksis la salajrojn por *Speenhamland* en la jaro 1795, ili estis tagmanĝintaj, sed evidente pensis, ke la laboristoj ne bezonas ion tian … Ili decidis, ke la semajna salajro estu po 3 ŝilingoj por ĉiu viro, kiam la panbulo de 8 funtoj kaj 11 uncoj kostas 1 ŝilingon, kaj ĝi devas regule kreski, ĝis kiam la panbulo kostas 1 ŝ. 5 d. Ekde kiam ĝi kreskas super tiu prezo, la salajro proporcie malaltiĝu, ĝis kiam la prezo de la panbulo atingos 2 ŝ; kaj tiam la nutraĵo de la viro estu kvinonon malpli ol antaŭe.”[75]

En 1814, esplorkomitato de la Ĉambro de la Lordoj, demandis al iu A. Bennet, granda farmisto, magistrato, administranto de malriĉuldomo kaj oficiala reguligisto de kampkulturaj salajroj:

> „Ĉu observeblas ia ajn proporcio inter la valoro de la taglaboro kaj la subteno de la pastrejo por la laboristoj?” Respondo: „Jes. La salajra enspezo de ĉiu familio estas super la nominala salajro kompletigata ĝis la prezo de la pano (8 funtoj kaj 11 uncoj) kaj 3 d. pokape … Ni supozas tiun panbulon sufiĉa por

---

anstataŭ de tritiko, sekalo kaj viando vivas dum monatoj de avena grio kaj hordea faruno, nur miksitaj kun salo kaj akvo, kaj tion krome eĉ tre komforte (*and that very comfortably too*)”. (l.c., vol. I, libro II, ĉap. II, p. 503) Similaj „indikoj” aperis en la 19-a jarcento. „La anglaj kampkulturaj laboristoj”, tiel ekz-e, „ne volas manĝi miksaĵojn de malaltaj grenspecoj. En Skotlando, kie la edukado estas pli bona, tiu antaŭjuĝo estas verŝajne nekonata.” (Charles H. Parry M.D., *„The Question of the Necessity of the Existing Corn Laws Considered”*, Londono, 1816, p. 69) La sama Parry tamen plendas, ke la angla laboristo estas nun (1815) en multe pli malbona kondiĉo ol en la tempo de Eden (1797).

74 El la raportoj de la lasta parlamenta esplorkomisiono pri falsado de vivrimedoj oni vidas, ke eĉ la falsado de medikamentoj en Anglio ne estas escepto, sed regulo. Ekz-e la ekzameno de 34 provaĵoj de opio, aĉetitaj en same multaj londonaj apotekoj, rezultigis, ke 31 estis falsitaj per papava kapsulo, tritik-faruno, gumŝlimo, argilo, sablo ktp. Multaj entenas eĉ ne unu atomon da morfino.

75 G. L. Newnham (*barrister at law* (advokato]): *„A Review of the Evidence before the Committees of the two Houses of Parliament on the Corn Laws”*, Londono, 1815, p. 20, noto.

> vivtenado de unu familio dum la semajno; kaj la 3 d. estas por vestaĵoj; kaj se la pastrejo volas mem provizi la vestaĵojn, la 3 d. estas deprenataj. Tiu praktiko regas ne nur en la tuta okcidento de *Wiltshire*, sed, mi kredas, en la tuta lando."[76] „Tiel", krias tiutempa burĝa verkisto, „la farmistoj dum jaroj degradis respektindan klason de siaj samlandanoj, per tio ke ili devigis ilin serĉi rifuĝon en la azilo (*workhouse*) … La farmisto pliigis siajn proprajn gajnojn per tio ke li malhelpis la akumuladon de eĉ la plej nemalhavebla konsumfonduso flanke de la laboristoj."[77]

Kiun rolon nuntempe la rekta rabado je la necesa kon-sumfonduso de la laboristo ludas en la konsistigo de la plusvaloro kaj pro tio de la akumuladfonduso de la kapitalo, tion montris ekz-e la tiel nomata domlaboro (vidu la ĉapitron 15, 8, c). Pliaj detaloj troviĝos dum tiu ĉi sekcio.

Kvankam en ĉiuj industribranĉoj la parto de la konstanta kapitalo kiu konsistas el laborrimedoj devas sufiĉi por certa nombro da laboristoj determinita per la grando de la instalaĵo, ĝi tamen tute ne devas ĉiam kreski en la sama proporcio kiel la kvanto de dungitaj laboristoj. En fabrik-instalaĵo ekz-e cent laboristoj liveras ĉe okhora laboro 800 laborhorojn. Se la kapitalisto volas altigi tiun sumon je la duono, tiam li povas dungi 50 pliajn laboristojn; sed tiam li devas ankaŭ antaŭpagi novan kapitalon, ne nur por salajroj, sed ankaŭ por laborrimedoj. Sed li povas ankaŭ laborigi la malnovajn 100 laboristojn dum 12 horoj anstataŭ dum 8, kaj tiam jam sufiĉas la ekzistantaj laborrimedoj, kiuj tiam nur pli rapide eluziĝas. Tiel, kroma laboro, estigita per pli alta streĉado de la laborforto, povas altigi la plusprodukton kaj la plusvaloron, la substancon de la akumulado, sen proporcia pliigo de la konstanta kapitalparto.

En la ekstrakta industrio, ekz-e en la minejoj, la krudmaterialoj ne konsistigas parton de la antaŭpagata kapitalo. La laborobjekto estas ĉi tie ne produkto de pasinta laboro, sed donaco de la naturo, ekz-e metalerco, mineraloj, karbo, ŝtonoj ktp. Tie la konstanta kapitalo konsistas preskaŭ ekskluzive el laborrimedoj, kiuj povas tre bone elteni plian laborkvanton (tag- kaj nokt-skipojn de laboristoj ekz-e). Sed kun ĉiuj ceteraj cirkonstancoj senŝanĝaj, la kvanto kaj valoro de la produkto kreskas en rekta proporcio de la aplikata laboro. Kiel dum la unua tago de produktado, ĉi

---

76 l.c., p. 19, 20.

77 Ch. H. Parry, l.c., p. 77, 69. La sinjoroj kamparaj baronoj siavice ne nur „sendamaĝigis" sin pro la kontraŭjakobena milito, kiun ili faris nome de Anglio, sed eskterordinare riĉigis sin. „Iliaj rentoj duobliĝis, triobliĝis, kvarobliĝis kaj, en esceptaj kazoj, sesobliĝis en 18 jaroj." (saml., p. 100, 101)

tie kuniĝas la produktestigantoj, do ankaŭ la estigantoj de la materiaj elementoj de la kapitalo, homo kaj naturo. Danke al la elasteco de la laborforto la kampo de la akumulado plilarĝiĝis sen antaŭa pligrandigo de la konstanta kapitalo.

En la kampkulturo oni ne povas etendi la kulturatan grundon sen antaŭpago de kromaj semoj kaj sterkoj. Sed post kiam tiu antaŭpago estas farita, eĉ la pure meĥanika prilaborado de la grundo faras miraklan efikon por la pligrandigo de la produkto. Pli granda laborkvanto, farata de la ĝisnuna nombro de laboristoj, tiel pliigas la fekundecon sen postuli novan antaŭpagon por laborrimedoj. Ree estas la rekta efiko de la homo al la naturo, kiu fariĝas rekta fonto de pliigita akumulado, sen interveno de nova kapitalo.

Fine en la proprasenca industrio – manufakturoj, fabrikoj, uzinoj – ĉia kroma elspezo je laboro premisas proporcian kromelspezon por krudmaterialo, sed ne nepre ankaŭ por laborrimedoj. Kaj ĉar la ekstrakta industrio kaj kampkulturo liveras al la fabrikanta industrio siajn krudmaterialojn kaj laborrimedojn, la kromprodukto akirita en ili sen kroma kapitalo fariĝas ankaŭ la avantaĝo de la fabrikanta industrio.

Ĝenerala rezulto: Per tio, ke la kapitalo enkorpigas al si la du praestigantojn de la riĉaĵo, laborforton kaj teron, ĝi akiras ekspansiforton, kiu ebligas al ĝi etendi la elementojn de sia akumulado trans la limojn ŝajne metitajn de sia propra grando, t.e. metitajn de la valoro kaj la kvanto de la jam produktitaj produktadrimedoj, en kiuj ĝi ekzistas.

Kroma grava faktoro en la akumulado de la kapitalo estas la produktivgrado de la socia laboro.

Kun la produktadforto de la laboro kreskas la produktokvanto, en kiu prezentiĝas certa valoro, do ankaŭ plusvaloro de donita grando. Ĉe senŝanĝa kaj eĉ ĉe falanta kvoto de la plusvaloro, kondiĉe ke ĝi falas pli malrapide ol la produktadforto de la laboro kreskas, la kvanto de la plusprodukto kreskas. Ĉe senŝanĝa divido de la plusprodukto en enspezon (*revenue*) kaj kromkapitalon, la konsumado de la kapitalisto povas do kreski sen malpliigo de la akumuladfonduso. La proporcia grando de la akumuladfonduso povas kreski eĉ surkoste de la konsumfonduso, dum la malplikostiĝo de la varoj disponigas al la kapitalisto same multajn aŭ eĉ pli da ĝurimedoj ol antaŭe. Sed kun la kreskanta produktivo[78] de la laboro

78 *Produktadforto* kaj *produktivo* estas sinonimaj; tamen la Esperanta traduko sekvas la uzadon de Markso *Produktivkraft* (produktadforto) kaj *Produktivität*

iras man-en-mane, kiel ni vidis, la malplikostiĝo de la laboristo, do kreskanta kvoto de la plusvaloro, eĉ se la reala salajro kreskas. Tiu kreskas neniam proporcie kun la produktivo de la laboro. La sama varia kapitalvaloro prezentiĝas en pli da produktadrimedoj, t.e. pli da laborrimedoj, labormaterialo kaj helpmaterialoj, liveras do pli da produktestigantoj kaj da valorestigantoj aŭ laborensuĉantoj. Ĉe senŝanĝa kaj eĉ malkreskanta valoro de la kromkapitalo okazas do akcelita akumulado. Okazas ne nur ke la skalo de la reproduktado materiale etendiĝas, sed la produktado de plusvaloro kreskas pli rapide ol la valoro de la kromkapitalo.

La evoluo de la produktadforto de la laboro reagas ankaŭ al la orignina kapitalo aŭ al la kapitalo jam troviĝanta en la produktadprocezo. Parto de la funkcianta konstanta kapitalo konsistas el laborrimedoj, ekz-e maŝinaro ktp, kiuj konsumiĝas nur en iom longaj periodoj kaj pro tio estas reproduktataj aŭ anstataŭigataj per novaj samspecaj ekzempleroj. Sed ĉiujare parto de tiuj laborrimedoj mortas aŭ atingas la finan celon de sia produkta funkcio. Ĝi troviĝas do ĉiujare en la stadio de sia perioda reproduktiĝo aŭ de sia anstataŭiĝo per novaj samspecaj ekzempleroj. Se la produktadforto de la laboro en la naskiĝejo de tiuj laborrimedoj etendiĝis, kaj ĝi evoluas daŭre kun la seninterrompa fluo de la scienco kaj de la teĥniko, tiam pli efika kaj, konsidere ĝian pli grandan efikecon, pli malmultekosta maŝino, ilo, aparato ktp venas sur la lokon de la malnova. La malnova kapitalo estas reproduktata en pli produktiva formo, sendepende de la konstanta detalŝanĝo ĉe la ekzistantaj laborrimedoj. La alia parto de la konstanta kapitalo – krudmaterialo kaj helpmaterialoj – estas konstante reproduktata ene de la jaro, tiu produktata en la kampkulturo plej ofte jare. Ĉia enkonduko de novaj metodoj ktp efikas tie do preskaŭ samtempe al la kromkapitalo kaj al la jam funkcianta kapitalo. Ĉia progreso de la ĥemio obligas ne nur la nombron da utilaj materialoj kaj la utilajn aplikojn de la jam konataj, kaj pro tio etendas kun la kresko de la kapitalo ties investsferojn. Ĝi instruas samtempe kiel reĵeti la ekskrementojn de la produktad- kaj konsumad-procezo en la cirkuladon de la reproduktadprocezo, kreas do sen antaŭa kapitalelspezo novan elementon por kapitalo. Same kiel pli granda ekspluatado de la naturriĉaĵo per nur pli alta streĉado de la laborforto, scienco kaj teĥniko konsistigas ekspansi-kapablon de la funkcianta kapitalo sendepende de ties grando. Ĝi reagas samtempe al la parto de la origina kapitalo kiu eniris sian renoviĝan stadion. En ĝian novan formon ĝi enkorpigas senpage la socian progreson kiu okazis

(produktivo). -vl

kvazaŭ malantaŭ la dorso de ĝia malnova formo. Tamen tiu disvolviĝo de la produktadforto estas samtempe akompanata de parta malplivaloriĝo de la funkciantaj kapitaloj. Tie, kie tiu malplivaloriĝo akre sentiĝas pro la konkurenco, ĝia ĉefa efiko trafas la laboriston, en kies pli granda ekspluatado la kapitalisto serĉas kompenson.

La laboro transmetas al la produkto la valoron de la produktadrimedoj kiujn ĝi konsumas. Aliflanke la valoro kaj kvanto de la produktadrimedoj, movataj de donita kvanto da laboro, kreskas en la proporcio, en kiu la laboro fariĝas pli produktiva. Kvankam do la sama laborkvanto aldonas al siaj produktoj nur la saman sumon de novvaloro, tamen kreskas la malnova kapitalvaloro, kiun ĝi samtempe transmetas al ili, kun kreskanta produktivo de la laboro.

Se angla kaj ĉina ŝpinistoj ekz-e laboras la saman nombron da horoj kun la sama intenseco, ili produktas en unu semajno la samajn valorojn. Malgraŭ tiu sameco ekzistas giganta diferenco inter la valoro de la semajnprodukto de la anglo, kiu laboras per potenca aŭtomato, kaj tiu de la ĉino, kiu havas nur ŝpinradon. En la sama tempo, dum kiu la ĉino ŝpinas funton da kotono, la anglo ŝpinas plurcent funtojn. Plurcentoble pli granda sumo de malnovaj valoroj ŝveligas la valoron de lia produkto, en kiu ili estas konservataj en nova uzebla formo kaj povas tiel denove funkcii kiel kapitalo.

> „En la jaro 1782”, instruas al ni Frederiko Engelso, „la tuta lanrikolto” (en Anglio) „restis pro manko de laboristoj ankoraŭ neprilaborita kaj devintus resti tia, se ne la nove inventita maŝinaro venintus al helpo kaj ĝin ŝpinintus.”[79]

La laboro konkretigita en formo de maŝinaro kompreneble ne rekte venigis eĉ unu homon el la nenio, sed ĝi ebligis al malgranda nombro de laboristoj, per aldono de relative malmulta viva laboro, ne nur produktante konsumi la lanon kaj aldoni al ĝi novan valoron, sed en la formo de fadeno ktp konservi ĝian malnovan valoron. Ĝi liveris per tio samtempe la rimedon kaj la stimulon al etendita reproduktado de lano. Estas la natura eco de la viva laboro, konservi malnovan valoron, dum ĝi kreas novan valoron. Kun la kresko de efikeco, amplekso kaj valoro de ĝiaj produktadrimedoj, do kun la akumulado kiu akompanas la disvolvadon de ĝia produktadforto, la laboro konservas kaj eternigas en ĉiam nova formo

79 Friedrich Engels: „Lage der arbeitenden Klasse in England” [Frederiko Engelso: Situacio de la laboranta klaso en Anglio”], p. 20 <Vd MEW, vol. 2, p. 244>

ĉiam ŝvelantan kapitalvaloron.[80] Tiu naturforto de la laboro aperas kiel memkonserviĝa forto de la kapitalo, kiu estas al ĝi enkorpiĝinta, tute kiel ĝiaj sociaj produktadfortoj kiel ĝiaj ecoj, kaj kiel la konstanta alproprigo de la pluslaboro fare de la kapitalisto kiel konstanta memplivalorigo de la kapitalo. Ĉiuj fortoj de la laboro alprenas la ŝajnon de fortoj de la kapitalo, kiel ĉiuj valorformoj de la varo kiel formoj de la mono.

Kun la kresko de la kapitalo kreskas la diferenco inter aplikata kaj konsumata kapitalo. Per aliaj vortoj: Estas kreskado de la valor- kaj aĵkvanto de la laborrimedoj, ekz-e konstruaĵoj, maŝinaro, dreniloj, labor-

80 La klasika ekonomio, pro mankhava analizo de la labor- kaj plivalorig-procezo, neniam bone komprenis tiun ĉi gravan elementon de la reproduktado, kiel videblas ekz-e ĉe Ricardo. Li diras ekz-e: Kia ajn estas la ŝanĝiĝo de la produktadforto, „unu miliono da homoj produktas en la fabrikoj ĉiam la saman valoron”. Tio ĝustas, se la daŭro kaj la intenso de ilia laboro restas konstantaj. Sed ĝi ne malhelpas, kaj Ricardo pretervidas tion en certaj konkludoj, ke miliono da homoj transformas, kun diversa produktadforto de sia laboro, tre diversajn kvantojn da produktadrimedoj en produkton, do konservas tre diversajn valorkvantojn en sia produkto, ke la produktvaloroj, kiun ili liveras, estas do tre malsamaj. Ricardo, cetere, per tiu ekzemplo provis vane klarigi al J. B. Say la diferencon inter uzvaloro (kiun li ĉi tie nomas *wealth*, materian riĉaĵon) kaj interŝanĝvaloron. Say respondas: „Koncerne la malfacilon, kiun Ricardo nomas, kiam li diras, ke ĉe pli bona metodo miliono da homoj povas produkti du- ĝis tri-oble pli da riĉaĵoj, sen produkti pli da valoro, tiam malaperas tiu malfacilaĵo, se oni, kiel necese, konsideras la produkton kiel interŝanĝon, ĉe kiu oni donas la produktivajn servojn de sia laboro, de sia tero kaj de siaj kapitaloj, por akiri produktojn. Per tiuj produktivaj servoj ni ja ricevas ĉiujn produktojn, kiuj ekzistas en la mondo … Do, … ni estas des pli riĉaj, niaj produktivaj servoj havas des pli grandan valoron, ju pli grandaj estas la kvanto da utilaj aĵoj, kiujn ili havigas per la interŝanĝo nomata produktado. (J. B. Say: *Lettres à M. Malthus*, Parizo, 1820, p. 168, 169) La malfacilaĵo – ĝi ne ekzistas por li, ne por Ricardo –, kiun Say devas klarigi, estas jena: Kial la valoro de la uzvaloroj ne pliiĝas, kiam ilia kvanto kreskas pro kreskinta produktadforto de la laboro? Respondo: La malfacilaĵo solviĝas per tio, ke oni bonvole nomu la uzvaloron interŝanĝvaloro. Interŝanĝvaloro esta io iel aŭ alie konektita kun la interŝanĝo. Se oni do nomas la produktadon „interŝanĝo” de laboro kaj de produktadrimedoj kontraŭ la produkto, estas klare kiel akvo, ke oni ricevas des pli da interŝanĝvaloro, ju pli da uzvaloro oni ricevas el la produktado. Alivorte: Ju pli da uzvaloroj, ekz-e ŝtrumpoj, labortago liveras al la ŝtrumpfabrikisto, des pli riĉa li estas je ŝtrumpoj. Sed subite Say ekhavas la ideon, ke „ĉe la pli granda kvanto” de la ŝtrumpoj falas ilia „prezo” (kiu kompreneble neniel rilatas kun la interŝanĝvaloro), „ĉar la

bestoj, ĉiaj aparatoj, kiuj funkcias dum pli aŭ malpli longaj periodoj, en konstante ripetataj produktadprocezoj, en sia tuta amplekso aŭ servas por atingo de certaj uzefikoj, dum ili foruziĝas nur iom post iom, pro tio perdas sian valoron nur popece, do ankaŭ transdonas ĝin nur popece al la produkto. En la proporcio, en kiu tiuj laborrimedoj servas kiel produktestigantoj, sen aldoni valoron al la produkto, do tute aplikataj, sed nur parte konsumataj, ili faras, kiel antaŭe menciite, la samajn senpagajn servojn kiel naturfortoj, akvo, vaporo, aero, elektro ktp. Tiu senpaga servo de pasinta laboro, se prenita kaj animata de viva laboro, akumuliĝas kun la kreskanta skalo de la akumulado.

Ĉar la pasinta laboro maskas sin ĉiam en kapitalon, do la pasivo de la laboro de A, B, C ktp en la aktivon de la nelaboristo X, burĝoj kaj politikaj ekonomikistoj estas plena de laŭdo por la meritoj de la pasinta laboro, kiu laŭ la skota genio MacCulloch devas eĉ ricevi propran pagon (interezon, profiton ktp).[81] La ĉiam pli grava pasinta laboro, kiu kunefikas en la vivanta laborprocezo en la formo de produktadrimedoj, estas do atribuata al ĝia formo fremdigita al la laboristo mem – kies pasinta kaj nepagita laboro ĝi estas –, nome al ĝia kapitalformo.[82] La praktikaj agantoj de la

konkurenco devigas ilin" – la produktistojn – „fordoni la produktojn por tio, kion ili kostas". Sed de kie venas do la profito, se la kapitalisto aĉetas la varojn je la prezo, kiun ili kostas al li? Sed ne gravas. Say fine deklaras, ke sekve al la kreskinta produktivo ĉiu ricevas kontraŭ la sama ekvivalento du parojn da ŝtrumpoj anstataŭ antaŭe unu solan. La rezulto, ĉe kiu li alvenas, estas precize la frazo de Ricardo, kiun li volis refuti. Post tiu giganta pensostreĉo li alparolas Malthus-on per tiuj modestaj paroloj: „Jen, sinjoro, la bone fondita doktrino, sen kiu, kiel mi deklaras, ne eblas solvi la plej malfacilajn demandojn de la politika ekonomio, speciale, kiel eblas, ke nacio povas fariĝi pli riĉa, se ĝiaj produktoj valore malpliiĝas, kvankam la riĉaĵo estas valoro." (l.c., p. 170) Angla ekonomikisto rimarkigas pri similaj trukoj, kiuj svarmas en la „Lettres" de Say: „Tiuj afektitaj manieroj de babilado konsistigas ĝenerale tion, kion s-ro Say plaĉas nomi sia doktrino, kaj kiun li serioze urĝas Malthus-on instrui en *Hertford*, tiel kiel okazas jam „en pluraj partoj de Eŭropo. Li diras: «Se vi trovas ion paradoksan en ĉiuj ĉi proponoj, rigardu la aferojn kiujn ili esprimas, kaj mi kuraĝas kredi, ke ili aperos al vi tre simplaj kaj tre raciaj». Sen ajna dubo, kaj samtempe ili aperos sekve al la sama procezo ĉia alia ol originalaj aŭ gravaj." („*An Inquiry into those Principles Respecting the Nature of Demand* ktp", p. 116, 110)

81 MacCulloch akiris patenton por la invento de „salajro por pasinta laboro" („*wages of past labour*") longe antaŭ ol Senior akiris la patenton pri la salajro por abstinado" („*wages of abstinence*").

82 *En la franca eldono:* „Tiel la ĉiam pli potenca kunefikado, kiun, en formo de

kapitalisma produktado kaj iliaj ideologiaj porparolantoj ne kapablas pensi la produktadrimedon dise de la antagonisma socia karaktermasko, kiu nuntempe algluiĝas al ĝi, same kiel sklavisto ne povas pensi la laboriston mem dise de lia karaktero kiel sklavo.

Ĉe donita ekspluatgrado de la laborforto la kvanto de la plusvaloro estas determinata de la nombro da samtempe ekspluatataj laboristoj, kaj tiu respondas, kvankam en ŝanĝiĝanta proporcio, al la grando de la kapitalo. Do, ju pli la kapitalo pere de sinsekvaj akumuladoj kreskas, des pli kreskas ankaŭ la valorsumo, kiu fendiĝas en konsumfonduson kaj akumuladfonduson. La kapitalisto povas do pli ĝue vivi kaj samtempe pli „abstini”. Kaj fine ĉiuj risortoj de la produktado ludas des pli energie, ju pli ĝia skalo etendiĝas kun la kvanto de la antaŭpagita kapitalo.

## 5. La tiel nomata laborfonduso

El tiu ĉi esplorado rezultis, ke la kapitalo ne estas fiksa grando, sed elasta kaj kun la divido de la plusvaloro en enspezon (*revenue*) kaj kromkapitalon konstante fluktuanta parto de la socia riĉaĵo. Ni vidis krome, ke eĉ ĉe donita grando de la funkcianta kapitalo, la laborforto, scienco kaj tero (ekonomie komprenata kiel ĉiuj laborobjektoj nature ekzistantaj sen ajna interveno de la homo) enkorpigitaj al ĝi estas elastaj fortoj de la kapitalo, kiuj donas al ĝi, ene de certaj limoj, agspacon sendependan de ĝia propra grando. Ĉe tio ni abstraktis ĉiajn kondiĉojn de la cirkuladprocezo, kiuj kaŭzas tre diversajn efikecgradojn de la sama kapitalkvanto. Ĉar ni premisis la limojn de la kapitalisma produktado, do pure spontecan formon de la socia produktadprocezo, ni ignoris ĉian pli racian kombinadon, rekte kaj laŭplane efektivigeblan per la nun disponeblaj produktadrimedoj kaj laborfortoj.[83] La klasika ekonomiko de ĉiam ŝatis kompreni la socian kapitalon kiel fiksan grandon de fiksa efikogrado. Sed tiu antaŭjuĝo estis vere dogmigita de la ĝisosta filistro Jeremias Bentham, tiu sobre pedanta, ledlanga orakolo de la ordinara burĝa inteligento de la 19-a

laborrimedoj, la pasinta laboro alportas al la vivanta laboro, estas de tiuj saĝuloj atribuata ne al la laboristo, kiu faris ĝin, sed al la kapitalisto, kiu alproprigis ĝin al si.” -vl

83 *En la franca versio:* Ĉe la analizo de la kaŭzoj de tiu fenomeno ni metis nin en la vidpunkton de la produktado, sed oni ne forgesu ke la diversaj gradoj de rapideco de la cirkulado siavice kontribuas al konsiderinda modifado de la agado de donita kapitalo. -vl

jarcento.[84] Bentham estas inter la filozofoj tio, kio Martin Tupper estas inter la poetoj. Ambaŭ estis fabrikeblaj nur en Anglio.[85] Per lia dogmo la plej ordinaraj fenomenoj de la produktadprocezo, kiel ekz-e ties subitaj ekspansioj kaj kuntiriĝoj, eĉ la akumulado, fariĝas komplete nekompreneblaj.[86] La dogmo estis utiligata de Bentham mem kaj de Malthus, James Mill, MacCulloch ktp por apologiaj celoj, speciale por prezenti parton de la kapitalo, la varian aŭ en laborforton transformeblan kapitalon, kiel fiksan grandon. La materia ekzisto de la varia kapitalo, t.e. la kvanto da vivrimedoj kiun ĝi reprezentas por la laboristo, aŭ la tiel nomata laborfonduso, estis transformita en miton de speciala parto de la socia riĉaĵo, disigita de la resto per naturaj baroj kaj netransirebla. Por movi tiun parton de la socia riĉaĵo, kiu devas funkcii kiel konstanta kapitalo aŭ, por

84 Kp i.a. J. Bentham: *„Théorie des Peines et des Récompenses”*, trad. de Et. Dumont, 3-a eld., Parizo, 1826, vol. II, l. IV, ĉap. II.

85 Jeremias Bentham estas pure angla fenomeno. Eĉ ne esceptante nian [germanan] filozofon Christian Wolf, en nenia epoko kaj en neniu lando la plej banala trivialaĵo tiom memplaĉe disvastiĝis. La utilecprincipo ne estis inventaĵo de Bentham. Li reproduktis nur senspirite tion, kion Helvetius kaj aliaj francoj de la 18-a jarcento estis jam dirintaj spirite. Se oni volas ekz-e scii, kio estas utila al hundo, tiam oni devas esplori la hundnaturon. Tiu naturo ne konstrueblas el la „utilecprincipo”. Se apliki ĝiin al la homo, se oni volas prijuĝi ĉian homan agon, moviĝon, kondiĉojn ktp laŭ la utilecprincipo, tiam temas unue pri la ĝenerala homa naturo kaj poste unue pri la homnaturo en ĉiu epoko historie modifita. Bentham ne estas tiom detalema. Kun la plej seka naiveco li konsideras normala homo la modernan filistron, speciale la anglan filistron. Tio, kio estas utila al tiu stranga normalhomo kaj al ties mondo, tio estas ĝenerale utila. Laŭ tiu kriterio li prijuĝas poste la pasintecon, nuntempon kaj estontecon. Ekz-e la kristana religio estas utila, ĉar ĝi malpermesas la samajn misagojn kiujn la punleĝo jure kondamnas. Artkritiko estas „malutila”, ĉar ĝi ĝenas honorindajn homojn en ilia ĝuado de Martin Tupper, ktp. Per tia rubaĵo tiu bravulo, kies devizo estas „*nulla die sine linea*” – „neniun tagon sen streko” – plenigis montojn da libroj. Se mi havus la kuraĝon de mia amiko H[enriko] Hejno, mi nomus s-ron Jeremias genio de la burĝa stulteco.

86 „Ekonomikistoj emas pritrakti certan kvanton da kapitalo kaj certan nombron da laboristoj kiel produktadinstrumentojn de samforma forto kaj efikantajn kun certa samforma intenseco … Tiuj, kiuj asertas, ke varoj estas la solaj agantoj de la produktado, pruvas, ke la produktado entute ne etendeblas, ĉar por tia etendo oni devus antaŭe pliigi vivrimedojn, krudmaterialojn kaj laborilojn, kio fakte signifas, ke nenia kresko de la produktado povas okazi sen ĝia antaŭa kresko, aŭ, alivorte, ke ĉia kresko maleblas.” (S. Bailey, *„Money and its Vicissitudes”*, p. 58 kaj 70) Bailey kritikas la dogmon ĉefe el la vidpunkto de la cirkuladprocezo.

esprimi ĝian materian enhavon, kiel produktadrimedoj, necesas certa kvanto da viva laboro. Tiun kvanton indikas la teĥnologio. Sed tio, kio ne estas indikita, estas la nombro da laboristoj por fluigi tiun laborkvanton, ĉar ĝi ŝanĝiĝas kun la ekspluatgrado de la individua laborforto, kaj ankaŭ ne la prezo de tiu laborforto, sed nur ĝia krome tre elasta minimuma baro. La faktoj, kiuj estas la bazo de tiu dogmo, estas jenaj: Unuflanke la laboristo havs nek parolon nek voĉon ĉe la divido de la socia riĉaĵo en ĝurimedojn de la nelaboristoj kaj en produktadrimedojn. Aliflanke li povas nur en favoraj esceptokazoj etendi la tiel nomatan „laborfonduson" surkoste de la „enspezo" („*revenue*") de la riĉuloj.[87]

Al kiom absurda taŭtologio kondukas la metodo prezenti la kapitalisman baron de la laborfonduso kiel socian naturbaron, tion montru i.a. profesoro Fawcett:

> „La cirkulanta kapitalo de lando", diras li,[88] „estas ĝia laborfonduso. Do, por kalkuli la mezuman monsalajron, kiun ĉiu laboristo ricevas, ni devas nur simple dividi tiun kapitalon per la nombro de la laborista loĝantaro."[89]

Tio signifas do, ke ni unue sumu la reale pagatajn individuajn salajrojn, poste ni asertas ke tiu adicio estas la valorsumo de la „laborfonduso" trudita de Dio kaj Naturo. Fine ni dividas la tiel ricevitan sumon per la nombro da laboristoj, por ĉi-foje malkovri, kiom mezume ĉiu laboristo rajtas individue ricevi. Jen senkompare ruza proceduro. Ĝi ne malhelpas s-ron Fawcett samtempe diri:

> „La ĉioma riĉaĵo jare akumulata en Anglio estas dividita en du partojn. Unu

87 J. St. Mill diras en siaj „Principles of Polit. Economy" [libro II, ĉap. I, § 3]: „La produkto de la laboro estas nuntempe dividata en inversa proporcio al la laboro – la plej granda parto al tiuj, kiuj neniam laboras, la poste plej granda al tiuj, kies laboro estas nur nominala, kaj tiel sur malkreska skalo, la rekompenco ŝrumpas en la mezuro laŭ kiu la laboro fariĝas pli streĉa kaj pli malagrabla, ĝis tio, kie la plej laciga kaj plej elĉerpa laboro kun certeco ricevas nur la striktan minimumon por vivteni sin." Por eviti miskomprenojn mi diru ke, se homoj kiel J. St. Mill ktp kritikendas pro la kontraŭdiro inter siaj malnovaj ekonomikaj dogmoj kaj siaj modernaj tendencoj, estis tamen tute maljuste konfuzi ilin kun la aro de vulgarekonomikaj apologiistoj.

88 H. Fawcett, Prof. of Polit. Econ. at Cambridge: „The Economic Position of the British Labourer", Londono, 1865, p. 120.

89 Mi memorigu ĉi tie la leganton, ke la kategorioj: varia kaj konstanta kapitalo estas uzataj unue de mi. La politika ekonomio ekde A. Smith pelmele kunmiksas la en ili entenatajn konceptojn kun la formdiferencoj de fiksa kaj cirkulanta kapitalo devenantaj el la cirkuladprocezo. Pri tio pliaj detaloj troviĝos en la Dua Libro, dua sekcio.

parto estas en Anglio uzata por konservi nian propran industrion. Alia parto estas eksportata en aliajn landojn … La en nia industrio uzata parto ne estas grava porcio de la jare en tiu ĉi lando akumulata riĉaĵo.”[90]

La pli granda parto de la jare alkreskanta plusprodukto, forprenita el la angla laboristo sen ekvivalento, estas do kapitaligita ne en Anglio, sed eksterlande. Sed kun tiel eksportata kromkapitalo estas eksportata ja ankaŭ parto de la „laborfonduso” inventita de Dio kaj Bentham.[91]

90 Fawcett, l.c., p. 123, 122.

91 Oni povus diri, ke ne nur kapitalo, sed ankaŭ laboristoj, en la formo de elmigrado, estas ĉiujare eksportataj el Anglio. Sed la teksto nenie parolas pri la ŝparaĵo de la elmigrantoj, kiuj grandparte ne estas laboristoj. La filoj de farmistoj liveras grandan porcion. La angla kromkapitalo ĉiujare sendata eksterlanden por ricevi interezojn estas en senkompare pli granda proporcio al la jara akumulado ol la jara elmigrado estas en la jara kresko de la loĝantaro.

## *DUDEKTRIA ĈAPITRO Parto 1-a (sekcioj 1 ĝis 4) – La ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado*

### 1. Kreskanta postulo je laborforto kun la akumulado, ĉe senŝanĝa konsisto de la kapitalo

En tiu ĉi ĉapitro ni pritraktos la influon, kiun la kresko de la kapitalo faras sur la sorto de la laborista klaso. La plej grava faktoro ĉe tiu esplorado estas la konsisto de la kapitalo kaj la ŝanĝoj kiujn ĝi spertas dum la akumuladprocezo.

La konsisto de la kapitalo prezentiĝas el du vidpunktoj. Flanke de la valoro ĝi determiniĝas per la proporcio, en kiu ĝi dividiĝas en konstantan kapitalon, aŭ valoron de la produktadrimedoj, kaj varian kapitalon, aŭ valoron de la laborforto, kiu estas la tuta sumo de la salajroj. Flanke de la materio, tia kia ĝi funkcias en la produktadprocezo, ĉiu kapitalo dividiĝas en produktadrimedojn kaj vivan laborforton; tiu konsisto determiniĝas per la proporcio inter la kvanto de aplikataj produktadrimedoj unuflanke kaj de la laborkvanto necesa por ĝia aplikado aliflanke. Mi nomas la unuan la valorkonsiston, la duan la teĥnikan konsiston de la kapitalo. Inter ambaŭ ekzistas densa interrilato. Por esprimi tiun, mi nomas la valorkonsiston de la kapitalo, tiom kiom ĝi estas determinita de sia teĥnika konsisto kaj respegulas tiun: la organika konsisto de la kapitalo. Tie, kie ni parolas mallonge pri la konsisto de la kapitalo, temas ĉiam pri ĝia organika konsisto.

La multnombraj individuaj kapitaloj investitaj en iu produktadbranĉo havas inter si pli aŭ malpli diversan konsiston. La mezumo de iliaj individuaj konsistoj donas al ni la konsiston de la ĉiomkapitalo de tiu produktadbranĉo. Fine la ĉiommezumo de la mezumaj konsistoj de ĉiuj produktadbranĉoj donas al ni la konsiston de la socia kapitalo de lando, kaj en la sekvo ni pritraktos nur tiun lastan instancon.

Kresko de la kapitalo inkludas kreskon de ĝia varia aŭ en laborforton transformita parto. Parto de la plusvaloro transformita en kromkapitalon ĉiam retransformendas en varian kapitalon aŭ kroman laborfonduson. Ni supozu, ke la kapitalo restas senŝanĝa, apud alie senŝanĝaj cirkonstancoj, t.e. ke certa kvanto da produktadrimedoj aŭ da konstanta kapitalo ĉiam necesas la saman kvanton da laborforto por esti movata, tiam la postulo je laboro kaj la fonduso por vivteni la laboristojn evidente kreskas proporcie

kun la kapitalo kaj des pli rapide, ju pli rapide la kapitalo kreskas. Ĉar la kapitalo produktas jare plusvaloron, el kiu parto estas jare aldonita al la origina kapitalo, ĉar tiu kreskaĵo mem kreskas jare kun la kreskanta amplekso de la jam funkcianta kapitalo kaj ĉar fine, sub aparta sprono de la riĉiĝinstinkto – ekz-e la malfermo de novaj merkatoj, de novaj sferoj de kapitalinvesto pro nove disvolvitaj sociaj bezonoj ktp –, la skalo de akumulado subite etendeblas per nur ŝanĝita divido de la plusvaloro aŭ de la plusprodukto en kapitalon kaj enspezon (*revenue*), la akumuladbezonoj de la kapitalo povas superi la kreskon de la laborforto aŭ la nombron da laboristoj kaj pro tio la salajroj povas kreski. Tio fine devas okazi, se la supre menciita premiso senŝanĝe daŭras. Ĉar ĉiujare pli da laboristoj estas dungataj ol en la antaŭa, tial pli aŭ malpli frue la momento devas veni, en kiu la bezonoj de la akumulado komencas superi la kutiman alfluon de laboro, kie do komenciĝas salajrokresko. En Anglio sonas plendoj pri tio dum la tuta dekkvina kaj en la unua duono de la dekoka jarcentoj. La pli aŭ malpli favoraj cirkonstancoj, en kiuj la dunglaboristoj vivtenas sin kaj generas idojn, ŝanĝas tamen neniom la bazan karakteron de la kapitalisma produktado. Kiel la simpla reproduktado konstante reproduktas la kapital-rilaton mem – kapitalistoj unuflanke, dunglaboristoj aliflanke –, la reproduktado laŭ etendita skalo konstante reproduktas pli da kapitalistoj aŭ pli grandaj kapitalistoj sur unu poluso, pli da dunglaboristoj sur la alia. La reproduktado de la laborforto, kiu devas senĉese enkorpiĝi kiel pli-valorigrimedo al la kapitalo, ne povas seniĝi je ĝi, kaj kies servuteco al la kapitalo estas nur kaŝita de la ŝanĝo de la individuaj kapitalistoj, al kiuj ĝi vendas sin, estas efektive elemento de la reproduktiĝo de la kapitalo mem. Akumulado de la kapitalo estas do pliigo de la proletaro.[92]

92 Karl Marx, l.c. <vidu MEW, vol. 6, p. 410> – „Ĉe sama subpremado de la amasoj, lando estas des pli riĉa, ju pli da proletoj ĝi havas.” (Colins, *„L'Économie Politique, Source des Révolutions et des Utopies prétendues Socialistes”*, Parizo, 1857, vol. III, p. 331) „Proleto” ekonomie signifas nenion alian ol la dunglaboriston, kiu produktas kaj plivalorigas „kapitalon” kaj estas el-ĵetita sur la straton ekde kiam li estas superflua por la plivalorigbezonoj de „Sinjoro Kapitalo”, kiel Pecqueur [elp. pekér] nomas tiun personon. „La malsaneta proleto de la praarbaro” estas nur bela fantaziaĵo de Roscher [elp. rôŝer]. La praarbarano estas proprietulo de la praarbaro kaj traktas la praarbaron, tute same senĝene kiel la orangutango, kiel sian proprieton. Li do ne estas proleto. Tio estus la kazo, se la praarbaro ekpluat-us lin, anstataŭ li la praarbaron. Koncerne lian sanstaton, tiu rezistas al la komparo ne nur kun tiu de la moderna proleto, sed ankaŭ kun tiu de la sifilisaj kaj skrofolaj „alt”-klasanoj. Sed s-ro Wilhelm Roscher komprenas sub praarbaro verŝajne sian naskiĝ-regionan luneburgan erikejon.

La klasika ekonomiko komprenis tiun fakton tiom bone, ke A. Smith, Ricardo ktp, kiel antaŭe menciite, eĉ malĝuste identigas la akumuladon kun la konsumado de la tuta kapitaligita parto de la plusprodukto fare de produktivaj laboristoj aŭ kun ĝia transformado en kromajn dunglaboristojn. Jam en 1696 John Bellers diras:

> „Se iu havus 100.000 akreojn kaj same multajn pundojn da mono kaj same multajn brutojn, kio estus tiu riĉulo sen la laboristo alia ol mem laboristo? Kaj kiel la laboristoj riĉigas homojn, tiel: ju pli da laboristoj, des pli da riĉuloj … La laboro de la malriĉulo estas la minejo de la riĉulo."[93]

Tiel ankaŭ Bernard de Mandeville komence de la 18-a jarcento:

> „Kie la proprieto estas sufiĉe protektata, estus pli facile vivi sen mono ol sen malriĉuloj, ĉar kiu farus la laboron? … Kiel la laboristoj estas ŝirmendaj kontraŭ malsatmorto, tiel ili ricevu nenion kio valoras ŝparadon. Se ie kaj tie iu el la plej malsupra klaso per nekutima diligento kaj maldorlotado de sia ventro leviĝas super la situacion en kiu li elkreskis, tiam neniu rajtas malhelpi lin ĉe tio: estas eĉ nerefuteble la plej saĝa plano por ĉiu privata persono, por ĉiu privata familio en la socio, vivi modeste; sed estas la intereso de ĉiuj riĉaj nacioj, ke la plej granda parto de la malriĉuloj estu neniam senlabora kaj ke ili tamen ĉiam elspezu tion, kion ili enspezas … Tiuj, kiuj perlaboras sian vivon per sia ĉiutaga laboro, havas nenion kio spronas ilin servi krom siajn bezonojn, kiujn mildigi estus saĝe, sed kiujn kuraci estus malsaĝe. La sola afero kiu povas diligentigi la laborantan viron estas modesta salajro. Tro malgranda salajro faras lin laŭ lia respektiva temperamento etanima aŭ malespera, tro granda ofenda kaj maldiligenta. … El la ĝis nun dirito sekvas, ke en libera nacio, kie sklavoj ne estas permesataj, la plej sekura riĉaĵo estiĝas el amaso da laboremaj brakoj. Krom ke ili estas la neniam mankanta provizfonto por militŝiparo kaj armeo, sen ili ekzistus nenia ĝuo kaj la produkto de neniu lando estus profitiga. Por feliĉigi la socion" (kiu konsistas kompreneble el nelaborantoj) „kaj kontentigi la popolon eĉ sub ĝiaj plej malbonaj cirkonstancoj, necesas ke la granda plimulto restu same nescia kiel malriĉa. Kono ampleksigas kaj multobligas niajn dezirojn, kaj ju malpli iu deziras, des pli facile liaj bezonoj kontentigeblas."[94]

Tio, kion Mandeville – sincera inteligentulo – ankoraŭ ne komprenas, estas ke la meĥanismo de la akumuladprocezo mem kun la kapitalo

93 John Bellers, l.c., p. 2.

94 B. de Mandeville, („*The Fable of the Bees*", 5-a eld., Londono, 1728, Remarks, p. 212, 213, 328) – „Modesta vivo kaj konstanta laboro estas por la malriĉulo la vojo al materia feliĉo" (sub kio li komprenas kiom eble plej longan labortagon kaj kiom eble plej malmultajn vivrimedojn) „kaj al la riĉaĵo por la ŝtato" (nome grundproprietuloj, kapitalistoj kaj iliaj politikaj moŝtuloj kaj agentoj). („*An Essay on Trade and Commerce*", Londono, 1770, p. 54)

pliigas la kvanton de la „laborantaj brakoj”, t.e. de la dunglaboristoj, kiuj transformas sian laborforton en kreskantan plivalorigforton de la kreskanta kapitalo kaj pro tio devas eternigi sian rilaton de dependeco de sia propra produkto personigita en la kapitalisto. Koncerne tiun dependecrilaton Sir F. M. Eden rimarkigas en sia „Situacio de la malriĉuloj, aŭ historio de la laboranta klaso de Anglio”:

> „Nia zono postulas laboron por kontentigi la bezonojn, kaj pro tio almenaŭ parto de la socio devas senlace labori … Kelkaj, kiuj ne laboras, havas tamen la produktojn de la diligento je sia dispono. Sed tion tiuj proprietuloj dankas nur al la civilizacio kaj al la ordo; tiuj estas puraj kreaĵoj de la burĝaj institucioj.[95] Ĉar tiuj agnoskis, ke oni povas alproprigi al si la fruktojn de la laboro ankaŭ alie ol per laboro. La homoj de sendependa havaĵo dankas sian havaĵon preskaŭ tute al aliies laboro, ne al sia propra kapablo, kiu tute ne estas pli bona ol tiu de la aliuloj; ne estas la posedo de grundo kaj de mono, sed la komando super laboro (*the command of labour*), kiu distingas la riĉulojn disde la malriĉuloj … Kio taŭgas por la malriĉuloj, ne estas mizera aŭ servuta situacio, sed komforta kaj liberala dependecrilato (*a state of easy and liberal dependence*), kaj por la proprietuloj sufiĉa influo kaj aŭtoritato super tiuj, kiuj laboras por ili … Tia dependecrilato estas, kiel ĉiu konanto de la homa naturo scias, necesa por la komforto de la laboristoj mem.”[96]

Cetere, Sir F. M. Eden estas la sola disĉiplo de Adam Smith kiu, en la 18-a jarcento, produktis rimarkindan verkon.[97]

---

95 Eden devintus demandi, kies kreaĵo estas „la burĝaj institucioj”? El la starpunkto de la jurista iluzio li rigardas la leĝon ne kiel produkton de la materiaj produktadkondiĉoj, sed inverse la produktadkondiĉojn kiel produkton de la leĝo. Linguet [elp. lengé] renversis la iluzian „Esprit des Lois” de Montesquieu [elp. monteskjé] per unu vorto: *„L’esprit des lois, c’est la propriété”* [La spirito de la leĝoj estas la proprieto”].

96 Eden l.c., vol. I, 1.1, ĉap. I, p. 1, 2 kaj *Preface*, p. XX.

97 Tiu ĉi frazo kiel la sekva piednoto troviĝas en la franca kaj hispana versioj. -vl

Oni eble obĵetus al mi la libron de Malthus „*Essai sur la Population*” [Eseo pri populacio/loĝantaro], publikigita en 1798, sed en sia unua formo ĝi estas nur deklamaĵo de lernanto de tekstoj pruntitaj de De Foc, Franklin, Wallace, Sir James Stewart, Townsend ktp. En ĝi ekzistas nek esploro nek ideo de la aŭtoro mem. La granda sensacio, kiun tiu junul-pamfleto kaŭzis, ŝuldiĝis nur al la partia spirito. La Franca Revolucio estis trovinta decidajn defendantojn en Anglio, kaj la „principo de populacio”, iom post iom ellaborita en la 18-a jarcento, poste, meze de granda socia krizo, laŭtege anoncita kiel la senmanka rimedo kontraŭ doktrinoj kiel tiu de Condorcet ktp, estis brue aplaŭdata de la angla oligarĥio kiel la estingilo de ĉiaj aspiroj al homa progreso.

Malthus, tute mirigita de sia sukceso, komencis nun senĉese ŝtopi en la

Sub la ĝis nun supozataj akumuladkondiĉoj, kiuj estas plej favoraj al la laboristoj, ilia dependecrilato de la kapitalo vestiĝas en elteneblaj aŭ, kiel Eden diras, „komfortaj kaj liberalaj" formoj. Anstataŭ intensiĝi kun la kresko de la kapitalo, ĝi nur pli etendiĝas, t.e. la ekspluat- kaj dominad-sfero de la kapitalo etendiĝas nur per sia propra dimensio kaj per la nombro de siaj subuloj. El ĝia propra ŝvelanta plusprodukto, ŝvelante transformata en kromkapitalon, pli granda parto refluas al ili en formo de pagrimedoj, tiel ke ili povas etendi la gamon de siaj ĝuoj, pli bone ekipi sian konsumfonduson por vestaĵoj, mebloj ktp kaj estigi malgrandajn

malnovan kadron novajn materialojn supraĵe kompilitajn.

Komence la kampo de politika ekonomio estis kulturata de filozofoj kiel Hobbes, Locke, Hume, de aferistoj kaj ŝtatistoj kiel Tomaso Moro, Temple, Sully, de Witt, North, Law, Vanderlint, Cantillon, Franklin kaj, kun plej granda sukceso, de kuracistoj kiel Petty, Barbon, Mandeville, Quesnay ktp. Ĉirkaŭ la mezo de la 18-a jarcento la pastro Tucker, por lia epoko distingita ekonomikisto, kredas ankoraŭ ke li devas senkulpiĝi ke homo de lia sankta profesio okupiĝas pri monaferoj. Poste protestantaj pastroj establiĝas en la politika ekonomio, sub la ŝildo de la „principo de populacio", kaj tiam ili svarmas tie. Escepte de la venezia monaĥo Ortes, spirituala kaj originala verkisto, la plej multaj saĝuloj pri populacio estas protestantaj pastroj. Ni citu ekz-e Bruckner, kiu en sia „Teorio de la animala sistemo" [„*Théorie du système animal*"], Lejdeno, 1767, antaŭformulis la tutan modernan teorion pri loĝantaro, la pastron Townsend, la pastron Malthus, kaj lian disĉiplon, la superpastron Th. Chalmers.

Malthus, kvankam pastro de la Anglikana Alta Eklekzio, almenaŭ ĵuris celibaton kiel „sociano" (*fellow*) de la Universitato de Kambriĝo: „*Socios collegiorum maritos esse non permittimus, sed statim postquam quis uxorem, duxerit, socius collegii desinat esse*." (R*eports of Cambridge University Commission*, p. 172) Ĝenerale, post skui la jugon de la katolika celibato, la protestantaj pastroj postulis kiel sian specialan mision la plenumadon de la biblia preskribo: „Kresku kaj multiĝu", kio ne malhelpas ilin samtempe prediki al la laboristoj la „principon de la populacio". Ili preskaŭ monopoligis tiun punkton de tikla doktrino, tiun ekonomian transvestigon de la prapeko, tiun pomon de Adamo, „la preman apetiton" kaj la obstaklojn kiuj emas malakrigi la sagojn de Kupido („*the checks which tend to blunt the shafts of Cupid*") kiel gaje diras la pastro Townsend. Oni emus diri, ke Petty antaŭsentis tujn fuŝulujn, kiam li skribis: „La religio floras ĉefe tie, kie la pastroj pentofare plej humiligas sin, same kiel la leĝo plej floras tie, kie la advokatoj mortas je malsato", sed, se la protestantaj pastroj persistas voli nek obei la apostolon Sankta Paŭlo nek turmenti sian karnon per celibato, ili zorgu almenaŭ pri tio ke ili ne generu pli da pastroj ol la disponeblaj beneficoj [eklezіaj oficoj ligitaj kun prebendo. -vl] entenas. „Se ekzistas nur dekdu mil beneficoj en Anglio, estas danĝere generi dudek kvar mil pastrojn („*it will not*

rezervfondusojn de mono. Sed same kiel pli bona vestaĵo, nutraĵo, pritraktado kaj pli granda *pekulio*[98] ne forigas la dependecrilaton kaj la ekspluatiĝon de la sklavo, tiel ankaŭ ne de la dunglaboristo. Kreskanta prezo de la laboro sekve al akumulado de la kapitalo signifas fakte nur, ke la amplekso kaj la pezo de la ora kateno, kiun la dunglaboristo jam forĝis al si mem, permesas ĝian pli malfortan streĉon. En la disputo pri tiu temo oni plej ofte pretervidis la ĉefaĵon, nome la signifan diferencon de la kapitalisma produktado. Laborforto estas ĉi tie aĉetata ne por kontentigi per ĝia servo aŭ per ĝia produkto la personajn bezonojn de la aĉetanto.

---

*be safe to breed twenty four thousand ministers*”), ĉar la dekdu mil sans-cure daŭre provas gajni sian panon kaj, por atingi tion, ili ne trovos pli bonan rimedon ol miksiĝi inter la popolo kaj persvadi ĝin ke la dekdu mil bénéficiaires venenigas la animojn kaj malsatigas ilin kaj malproksimigas ilin de la vera vojo kiu kondukas al la ĉielo.” (William Petty: *A Treatise on taxes and contributions*, Londono, 1667, p. 57) Same kiel Petty, Adam Smith estis abomenata de la pastraĉaro. >Eblas juĝi pri tio per skribaĵo titolita „*A letter to A. Smith, L. L. D. On the Life, Death and Philosophy of his Friend David Hume. By one of the Peaple called Christians*”, 4-a eld., Oksfordo, 1784. La aŭtoro de tiu pamfleto, doktoro Horne, anglikana episkopo de *Norwich*, riproĉas al A. Smith ke li publikigis leteron al s-ro Strahan, en kiu „li sanktoleas sian amikon David” (Hume), kie li rakontas al la mondo, ke „sur sia mortlito Hume amuziĝis per legado de Lukiano kaj ludado de visto” kaj kie li eĉ maldecas konfesi: „Mi ĉiam konsideris Hume same bona dum lia vivo kiel post lia morto kiel tiom proksima al la idealo de perfekta saĝulo kaj de virtulo kiom la malforteco de la homa naturo enhavas. La kolera episkopo ekkrias: „Ĉu decas do, sinjoro, prezenti al ni kiel perfekte saĝan kaj virtan la karakteron kaj la konduton de homo obsedata de tiom nekuracebla malsimpatio kontraŭ ĉio kio portas la nomon de religio, ke li turmentis sian spiriton por estingi eĉ tiun nomon el la memoro de la homoj? … Sed ne lasu vin senkuraĝigi, amikoj de la vero, la ateismo ne havas longan tempon antaŭ si … Vi (A. Smith) havis la abomenan perversecon (the atrocious wickedness) disvastigi la ateismon tra la lando (nome per la Teorio de Moralaj Sentoj) … Ni konas viajn ruzojn, sinjoro doktoro! La intenco ja ne mankas al vi, sed ĉi-foje vi kalkulas sen via gastiganto. Vi volas kredigi al ni, per la ekzemplo de David Hume, sinjoro, ke ne ekzistas alia refortigilo por la senkuraĝa spirito, ne alia kontraŭveneno kontraŭ la morttimo ol la ateismo … Ridu do pri la ruinoj de Babilono, kaj gratulu Faraonon, la ĝisostan fiulon! (l.c., p. 8, 17, 21, 22) – Alia ortodoksa anglikano, kiu estis frekventinta la kursojn de Adam Smith, rakontas al ni okaze de lia morto: „La amikeco de Smith por Hume malhelpis lin esti bona kristano. Li kredis Hume-on laŭvorte, se Hume dirintus al li ke la Luno estas verda fromaĝo, li kredintus tion. Tial li kredis lin ankaŭ laŭvorte, ke ekzistas nek Dio nek miraklo … En siaj politikaj principoj li tuŝis la respublikanismon.” („*The Bee, By James* Anderson”, Edinburgo, 1791-1793)

Ĝia celo estas plivalorigo de lia kapitalo, produktado de varoj kiuj entenas pli da laboro ol kiun li pagas, do entenas valorparton kiu kostas al li neniom kaj kiu estas tamen realigata per la varvendo. Produktado de plusvaloro aŭ plusfarado estas la absoluta leĝo de tiu produktadmaniero. La laborforto vendeblas nur en la mezuro laŭ kiu ĝi konservas la produktadrimedojn kiel kapitalon, reproduktas ilian propran valoron kiel kapitalon kaj liveras per nepagata laboro fonton de kromkapitalo.[99] La kondiĉoj de ĝia vendo, ĉu pli aŭ malpli favoraj por la laboristo, inkludas do la neceson de ĝia konstanta revendo kaj la ĉiam etenditan reproduktadon de la riĉaĵo kiel kapitalo. La salajro, kiel ni vidis, premisas laŭ sia naturo ĉiam ke la laboristo liveras certan kvanton da nepagata laboro. Tute sendepende de kresko de salajro kun falanta prezo de la laboro ktp, ĝia kresko en la plej bona kazo signifas nur kvantan malpliiĝon de la nepagata laboro, kiun la laboristo devas liveri. Tiu malpliiĝo povas neniam daŭri ĝis tiu punkto, kie ĝi minacus la sistemon mem. Escepte de perfortaj konfliktoj pri la kvoto de salajro – kaj Adam Smith jam montris, ke ĝenerale en tiaj konfliktoj la mastro restas ĉiam mastro –, kresko de la laborprezo rezultanta el akumulado de la kapitalo implicas jenan alternativon:

Aŭ la prezo de la laboro daŭre kreskas, ĉar ĝia altigo ne ĝenas la progreson de la akumulado; en tio troviĝas nenio mirakla, ĉar, diras A. Smith,

> „eĉ ĉe malkreskinta profito la kapitaloj tamen pliiĝas; ili kreskas eĉ pli rapide ol antaŭe … Granda kapitalo ĝenerale kreskas eĉ pli rapide ol malgranda kapitalo kun granda profito."[100]

– Fine la pastro Th. Chalmers suspektas Adam-on Smith esti inventinta la kategorion de „neproduktivaj laboristoj" intence por la protestantaj pastroj, spite al ties fruktodona laboro en la vinberejo de la Sinjoro.

98 Lat.: *peculium*. Havaĵo, ankaŭ en formo de mono, kiun la mastro povis doni, pli aŭ malpli regule, al sia sklavo, ekz-e pro ties „bona konduto". En certaj kazoj, la fina sumo de tiu pekulio atingis altecon sufiĉan por ke la sklavo povis per ĝi elaĉeti sin kaj tiel liberiĝi. -vl

99 Noto al la 2-a eldono: „Sed la limo de la dungo de industria kiel de kampaj laboristoj estas la sama: nome la ebleco por la entreprenisto akapari profiton el ilia laborprodukto. Se la kvoto de la salajro kreskas tiom alten, ke la profito de la mastro falas sub la mezuman profiton, tiam li ĉesas dungi ilin, aŭ li dungas ilin nur sub la kondiĉo ke ili permesas malaltigon de la salajro." (John Wade, l.c., p. 40)

100 l.c., vol. I, p. 189.

Tiukaze evidentas ke malpliigo de la nepagata laboro tute ne malutilas al la etendado de la kapital-regado. – Aŭ, kaj tio estas la alia flanko de la alternativo, la akumulado malfortiĝas pro la kreskanta laborprezo, ĉar la sprono de profito malakriĝas. La akumulado malkreskas. Sed kun ĝia malkresko malaperas la kaŭzo de ĝia malkresko, nome la misproporcio inter kapitalo kaj ekspluatata laborforto. La meĥanismo de la kapitalisma produktadprocezo forigas do mem la malhelpojn, kiuj ĝi provizore kreas. La laborprezo refalas al nivelo kongrua kun la plivalorigbezonoj de la kapitalo, egale ĉu sub, super aŭ sama kun la nivelo, kiu estis konsiderata normala antaŭ la komenco de la salajrokresko. Ni vidas: En la unua kazo ne estas la malpliiĝo de la absoluta aŭ de la proporcia kresko de la laborforto aŭ de la laborista loĝantaro, kiun la kapitalo faras superflua, sed inverse, la pliiĝo de la kapitalo, kiu faras la ekspluateblan laborforton nesufiĉa. En la dua kazo estas ne la pliiĝo de la absoluta aŭ de la proporcia kresko de la laborforto aŭ de la laborista loĝantaro, kiu faras la kapitalon nesufiĉa, sed inverse la malpliiĝo de la kapitalo, kiu faras la ekspluateblan laborforton, aŭ pli ĝuste ĝian prezon, superflua. Estas tiuj absolutaj moviĝoj en la akumulado de la kapitalo, kiuj respeguliĝas kiel relativaj moviĝoj en la kvanto de la ekspluatebla laborforto kaj kiuj pro tio ŝajnas esti ŝuldataj al la propra moviĝo de la laborforto. Por uzi matematikan esprimon: la grando de la akumulado estas la sendependa variablo, la grando de la salajro la dependa, ne inverse. Tiel esprimiĝas en la kriza fazo de la industria ciklo la ĝenerala falo de la varprezo kiel kresko de la relativa monvaloro, kaj en la prospera fazo la ĝenerala kresko de la varprezoj kiel falo de la relativa monvaloro. La tiel nomata *Currency*-skolo konkludas el tio, ke ĉe altaj prezoj tro multe da mono cirkulas, ĉe malaltaj prezoj tro malmulte da mono. <3-a kaj 4-a eldonoj: ĉe altaj prezoj tro malmulte, ĉe malaltaj tro multe da mono cirkulas.> Ĝia malscio kaj kompleta miskono de la faktoj[101] trovas indan paralelon en la ekonomikistoj, kiuj interpretas tiujn fenomenojn de la akumulado tiel, ke jen ekzistas tro malmulte kaj jen tro multe da dunglaboristoj.

La leĝo de la kapitalisma produktado, sur kiu baziĝas la laŭdira „natura populacileĝo”, simple rezultigas la jenon: La proporcio inter kapitalo, akumulado kaj salajrokvoto estas nenio alia ol la proporcio inter nepagata, en kapitalon transformita laboro kaj la kroma laboro necesa por movi la kromkapitalon. Do tute ne estas proporcio de du grandoj sendependaj unu

101 Kp Karl Marx: *„Zur Kritik der Politischen Ökonomie”* [Karlo Markso: „Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio”], p. 165 sj <vd MEW, vol. 13, p. 154sj>

de la alia, unuflanke de la grando de la kapitalo, aliflanke de la nombro de la laborista loĝantaro, ĝi estas lastinstance nur la proporcio inter nepagata kaj pagata laboro de la sama laborista loĝantaro. Se la kvanto de la nepagata laboro, liverata de la laborista klaso kaj akumulata de la kapitalista klaso, kreskas sufiĉe rapide por povi transformiĝi en kapitalon nur per eksterordinara aldono de pagata laboro, tiam la salajro kreskas, kaj, se ĉio alia restas senŝanĝa, la nepagata laboro proporcie malpliiĝas. Sed ekde kiam tiu malpliiĝo tuŝas la punkton, kie la kapitalon nutranta pluslaboro jam ne estas proponata en sufiĉa kvanto, aperas reago: malpli granda parto de la enspezo (*revenue*) estas kapitaligata, la akumulado eklamas, kaj la kreskanta salajromoviĝo ricevas kontraŭbaton. La altigo de la laborprezo restas do enfermita en limoj, kiuj ne nur lasas la bazojn de la kapitalisma sistemo netuŝitaj, sed ankaŭ certigas ĝian reproduktadon laŭ etendita skalo. La en naturleĝon mistifikita leĝo de la kapitalisma akumulado esprimas do fakte nur, ke ĝia naturo ekskludas ĉian tian malpliiĝon de la ekspluatgrado de la laboro aŭ ĉian tian altigon de la laborprezo, kia povus serioze endanĝerigi la konstantan reproduktadon de la kapitalrilato kaj ĝian reproduktadon laŭ ĉiam pli etendita skalo. Ne povas esti alie en produktadmaniero, en kiu la laboristo ekzistas por la plivalorigbezonoj de ekzistantaj valoroj, anstataŭ inverse la konkreta riĉaĵo por la evolubezonoj de la laboristo. Kiel la homo estas en la religio dominata de la produktoj de sia propra cerbo, tiel li estas en la kapitalisma produktado dominata de la produkto de sia propra mano.[102]

## 2. Relativa malpliiĝo de la varia kapitalo en la daŭrigo de la akumulado kaj de la ĝin akompananta koncentriĝo

Laŭ la ekonomikistoj mem estas nek la ekzistanta amplekso de la socia riĉaĵo nek la grando de la jam akirita kapitalo kiu kaŭzas altigon de salaj-

102 „Sed se ni reiras al nia unua esplorado, kie estas pruvite … ke la kapitalo mem estas nur la produkto de homa laboro … tiam ŝajnas tute nekomprenebla, ke la homo povas veni sub la regadon de sia propra produkto – la kapitalo – kaj esti subordigita al ĝi; kaj ĉar tio en la realo okazas ja nekontesteble, tial senvole trudiĝas la demando: kiel la laboristo povis fariĝi el la reganto de la kapitalo – kiel ties kreinto – la sklavo de la kapitalo? (Von Thünen: „*Der isolirte Staat* [La izolita ŝtato]”, *Zweiter Theil, Zweite Abtheilung*, Rostoko, 1863, p. 5, 6) Estas la merito de Thünen ke li demandis. Lia respondo estas simple infaneca.

ro, sed nur la kontinua kreskado de la akumulado kaj la rapidecgrado de ĝia kresko.[103] Ĝis nun ni rigardis nur apartan fazon de tiu procezo, tiun, en kiu la kapitalkresko okazas ĉe senŝanĝa teĥnika konsisto de la kapitalo. Sed la procezo transiras tiun fazon.

Ekde kiam la ĝeneralaj bazoj de la kapitalisma sistemo estas donitaj, la procezo de la akumulado ĉiufoje atingas punkton, en kiu la evoluo de la produktivo de la socia laboro fariĝas la plej potenca levilo de la akumulado.

> „La sama kaŭzo", diras A. Smith, „kiu altigas la salajrojn, nome la pliiĝo de la kapitalo, spronas al pliigo de la produktivaj kapabloj de la laboro kaj kapabligas pli grandan laborkvanton estigi pli grandan kvanton da produktoj."

Sen konsidero de la naturkondiĉoj, ekz-e fekundeco de la grundo ktp, kaj de la lerteco de sendepende kaj izolite laborantaj produktistoj, kiu efikas tamen pli kvalite ol kvante en la amaso de la produktoj, la socia produktivgrado de la laboro esprimiĝas en la relativa amplekso de la produktadrimedoj, kiujn laboristo, dum donita tempo, transformas en produkton per la sama streĉado de sia laborforto. La kvanto de la produktadrimedoj, per kiuj li funkcias, kreskas kun la produktivo de sia laboro. Tiuj produktadrimedoj ludas ĉe tio duoblan rolon. La kresko de la unua estas sekvo, la de la alia estas kondiĉo de la kreskanta produktivo de la laboro. Ekz-e per la manufaktureca labordivido kaj per la aplikado de maŝinaro en la sama tempo transformiĝas pli da krudmaterialo, do pli granda kvanto da krudmaterialo kaj da helpmaterialoj eniras la laborprocezon. Tio estas sekvo de la kreskanta produktivo de la laboro. Aliflanke la kvanto de la aplikata maŝinaro, laborbestoj, minerala sterkaĵo, dreniloj ktp estas premiso de la kreskanta laborproduktivo. Same la kvanto de la produktadrimedoj koncentritaj en konstruaĵoj, altfornoj, transportiloj ktp. Sed sendepende ĉu kondiĉo aŭ sekvo, la kreskanta amplekso de la produktadrimedoj kompare kun la al ili enkorpigata laborforto esprimas la kreskantan produktivon de la laboro.[104] Ties kresko

103 A. Smith, Libro 1, ĉap. 8.

104 *En la franca kaj hispana eldonoj troviĝas ĉi tie krome la jenaj paragrafoj:*

> Ĉe la naskiĝo de la granda industrio oni malkovris en Anglio metodon por transformi la gisitan feron en forĝeblan feron. Tiu procezo, kiun oni nomas pudlado kaj kiu konsistas en purigo de la giso en speciale konstruitaj altfornoj, okazigis egan grandigon de la altfornoj, uzadon de aparatoj de varma enblovo ktp, fine, tian multigon de laboriloj kaj materialoj uzataj de sama kvanto de laboro, ke la fero fariĝis baldaŭ sufiĉe abunda kaj sufiĉe malmultekosta por anstataŭi ŝtonon kaj lignon en multaj aplikaĵoj. Ĉar fero kaj karbo estas la

aperas do en la malkresko de la laborkvanto proporcie al la de ĝi movata kvanto de produktadrimedoj aŭ en la malkresko de la grando de la subjektiva faktoro de la laborprocezo, kompare kun ties objektivaj faktoroj.

Tiu ŝanĝiĝo en la teĥnika konsisto de la kapitalo, la kresko de la kvanto da produktadrimedoj kompare kun la kvanto de la ĝin viviganta laborforto, respeguliĝas en sia valorkonsisto, en la kresko de la konstanta parto de la kapitalvaloro surkoste de ĝia varia parto. Ekz-e, de kapitalo, kalkulate elcente, elspeziĝas origine po 50 elcentoj en produktadrimedoj kaj po 50 elcentoj en laborforto, poste, kun pli da evoluo de la laborproduktivo, po

grandaj leviloj de la moderna industrio, oni facile komprenas la gravecon de tiu invento.

Tamen, la pudlisto, la laboristo specialiĝinta en purigado de la gisaĵo, faras manlaboron tian ke la dimensioj de la altfornoj kiujn li povas prizorgi estas limigita de liaj personaj kapabloj, kaj ĝuste tiu limo bremsas nun la mirindan impeton kiun la metalurgia industrio spertis ekde 1780, dato de la invento de la pudlado.

„Evidentas”, krias la *Engineering*, unu el la organoj de la anglaj inĝenieroj, „ke la malmoderna procedo de permana pudlado estas apenaŭ pli ol resto de barbareco (*the fact is that the old process of hand-puddling is little better than a barbarism*) … La nuna tendenco de nia industrio estas ellabori ĉiam pli da materialoj en la diversaj gradoj de fabrikado. Tiel preskaŭ ĉiujare aperas pli grandaj altfornoj, pli pezaj vapormarteloj, pli potencaj laminejoj kaj pli gigantaj instrumentoj aplikataj en multaj branĉoj de la metalindustrio. Meze de tiu ĝenerala kresko – kresko de la produktadrimedoj kompare al la dungita laboro – la procedo de pudlado preskaŭ stagnis kaj hodiaŭ neelteneble malhelpas la industrian disvolvadon … Pro tio, en ĉiuj grandaj uzinoj oni anstataŭigas ĝin per altfornoj kun aŭtomata funkciado kaj kapablaj je kolosaj ŝargoj kiujn la manlaboro tute ne kapablas manipuli.” (*The Engeneering*, 13-a de junio 1874)

Do, post revolucii la fer-industrion kaj kaŭzi grandan etendiĝon de la laborrimedoj kaj de la kvanto de materialoj uzataj de certa laborkvanto, la pudlado fariĝis, en la procezo de akumulado, ekonomia obstaklo kiun oni nun forigas per novaj procedoj kapablaj deŝovi la limojn kiujn ĝi ankoraŭ trudas al pli alta kresko de la materiaj produktadrimedoj proporcie kun la dunglaboro. Jen la historio de ĉiuj malkovroj kaj inventoj kiuj okazas sekve al la akumulado, kion ni cetere pruvis per prezentado de la irado de la moderna produktado ekde ĝiaj komencoj ĝis nia epoko. (Vd. sekcion IV de tiu ĉi verko).

En la procedo de akumulado okazas do ne nur kvanta kaj samtempa kresko de la dive:rsaj realaj elementoj de la kapitalo: la disvolvado de la produktadforto de la socia laboro, kiun tiu progreso alportas, montriĝas ankaŭ per kvalitaj ŝanĝoj, per laŭgradaj ŝanĝoj de la teĥnika konsisto de la kapitalo, kies objektiva faktoro kreskas pli kaj pli en sia grando proporcie al la subjektiva faktoro,

80 elcentoj en produktadrimedoj kaj po 20 elcentoj en laborforto, ktp. Tiu leĝo de kreskanta kresko de la konstanta kapitalparto en proporcio al la varia konfirmiĝas ĉiupaŝe (kiel jam supre montrite) per la kompara analizo de la varprezoj, egale ĉu ni komparas diversajn ekonomiajn epokojn ĉe unu sola nacio aŭ diversajn naciojn en la sama epoko. La relativa grando de la prezelemento, kiu reprezentas nur la valoron de la konsumitaj produktadrimedoj aŭ la konstantan kapitalparton, estos ĉiam en rekta proporcio, la relativa grando de la alia prezelemento, kiu reprezentas la kapitalparton kiu pagas la laboron aŭ la varian kapitalparton, estos ĝenerale en inversa proporcio al la progreso de la akumulado.

La malpliiĝo de la varia kapitalparto kompare kun la konstanta, aŭ la ŝanĝita konsisto de la kapitalvaloro, montras tamen nur proksimume la ŝanĝon en la konsisto de ĝiaj materiaj partoj. Se ekz-e hodiaŭ la kapitalvaloro investita en la ŝpinado estas je $^{7}/_{8}$ konstanta kaj je $^{1}/_{8}$ varia, dum ĝi estis komence de la 18-a jarcento je ½ konstanta kaj je ½ varia, la kvanto de krudmaterialo, laborrimedoj ktp, kiun certa kvanto da ŝpinlaboro hodiaŭ konsumas, estas multcentoble pli granda ol komence de la 18-a jarcento. La kialo estas simple tiu, ke kun la kreskanta laborproduktivo ne nur kreskas la amplekso de la produktadrimedoj kiujn la laboro konsumas, sed ilia valoro, kompare kun ilia amplekso, malaltiĝas. Ilia valoro kreskas absolute, sed ne proporcie al ilia amplekso. La kresko de la diferenco inter konstanta kaj varia kapitalo estas do multe pli malgranda ol tiu de la diferenco inter la kvanto da produktadrimedoj, en kiun transformiĝas la konstanta, kaj la kvanto da laborforto, en kiun transformiĝas la varia kapitalo. La unua diferenco kreskas kun la lasta, sed en pli malalta grado.

Cetere, se la progreso de la akumulado malpliigas la relativan grandon de la varia kapitalo, ĝi per tio tute ne ekskludas la kreskon de ĝia absoluta grando. Ni supozu, ke kapitalvaloro fendiĝas komence en 50 elcentojn da konstanta kaj 50 elcentojn da varia kapitalo, poste en 80 elcentojn da konstanta kaj 20 elcentojn da varia. Se intertempe la origina kapitalo, ni diru 6.000 sterlingaj pundoj, kreskis al 18.000 pundoj, tiam ĝia varia parto kreskis ankaŭ je $^{1}/_{5}$. Ĝi estis 3.000 pundoj, ĝi estas nun 3.600 pundoj. Sed kie antaŭe kapitalalkresko de 20 elcentoj sufiĉintus por kreskigi la 20-elcentan kreskon de la postulo je laboro, tio bezonas nun triobligon de la

tio signifas ke la kvanto de instrumentoj kaj materialoj kreskas pli kaj pli kompare al la sumo de laborforto necesa por funkciigi ilin. Laŭ la mezuro en kiu la kresko de la kapitalo faras la laboron pli produktiva, ĝi malpliigas la postulon de ĝi proporcie al sia propra grando.” (-vl)

origina kapitalo.

En la kvara sekcio montriĝis, ke la disvolvado de la socia produktadforto de la laboro premisas grandskalan kunlaboradon, ke nur sub tiu kondiĉo organizeblas divido kaj kombinado de la laboro, produktadrimedoj ŝpareblas per amasa koncentriĝo, naskeblas produktadrimedoj jam materie nur komune uzeblaj, ekz-e maŝinsistemo ktp, gigantaj naturfortoj premeblas en la servon de la produktado kaj plenumeblas la transformado de la produktadprocezo en teĥnologian aplikadon de la scienco. Surbaze de la varproduktado – kie la produktadrimedoj estas proprieto de privataj personoj, kie la manlaboristo aŭ estas izolita kaj memstare produktas varojn aŭ vendas sian laborforton kiel varon, ĉar la rimedoj mankas al li por propra produktado – tiu premiso realiĝas nur per la kresko de la individuaj kapitaloj aŭ en la mezuro laŭ kiu la sociaj produktad- kaj vivrimedoj estas transformataj en proprieton de kapitalistoj. La bazo de varproduktado povas porti la grandskalan produktadon nur en kapitalisma formo. Certa akumulado de kapitalo en la manoj de individuaj varproduktistoj estas do la premiso de la specife kapitalisma produktadmaniero. Pro tio ni devis supozi ĝin ĉe la transiro el la metio en la kapitalisman entreprenon. Ĝi povas nomiĝi origina akumulado, ĉar anstataŭ historia rezulto ĝi estas historia bazo de la specife kapitalisma produktado. Kiel ĝi mem estiĝas, tion ni ne bezonas esplori ĉi tie. Sufiĉas mencii, ke ĝi estas la ekirpunkto. Sed ĉiuj metodoj por kreskigi la socian produktadforton de la laboro, kiuj elkreskas sur tiu bazo, estas samtempe metodoj de plia produktado de plusvaloro aŭ de plusprodukto, kiu siaflanke estas la elemento kiu estigas la akumuladon. Ili estas do samtempe metodoj de produktado de kapitalo per kapitalo aŭ metodoj de ĝia akcelata akumulado. La kontinua retransformado de plusvaloro en kapitalon prezentiĝas kiel kreskanta grando de la kapitalo eniranta en la produktadprocezon. Tiu grando fariĝas siavice bazo de etendita skalo de produktado, de la ĝin akompanantaj metodoj por kreskigi la produktadforton de la laboro kaj de akcelata produktado de plusvaloro. Se do certa grado de kapitalakumulado aperas kiel premiso de la specife kapitalisma produktadmaniero, tiu lasta siavice kaŭzas retroefike akcelitan akumuladon de la kapitalo. Kun la akumulado de la kapitalo disvolviĝas do la specife kapitalisma produktadmaniero kaj kun la specife kapitalisma produktadmaniero la akumulado de la kapitalo. Tiuj du ekonomiaj faktoroj produktas, laŭ la kunmetita rilato de la impulso, kiun ili donas al si reciproke, la ŝanĝon de la teĥnika konsisto de la kapitalo, per kiu la varia parto fariĝas ĉiam pli kaj pli malgranda, kompare kun la konstanta.

Ĉiu individua kapitalo estas pli aŭ malpli granda koncentriĝo de produktadrimedoj kun tiurilata komando super pli aŭ malpli granda laboristarmeo. Ĉiu akumulado fariĝas la rimedo de nova akumulado. Ĝi pliigas kun la pliiĝinta kvanto de la riĉaĵo funkcianta kiel kapitalo ĝian koncentriĝon en la manoj de individuaj kapitalistoj, pro tio la bazon de la produktado je granda skalo kaj de la specife kapitalismaj produktadmetodoj. La kreskado de la socia kapitalo okazas en la kreskado de multaj individuaj kapitaloj. Kun ĉiuj ceteraj cirkonstancoj supozataj senŝanĝaj, la individuaj kapitaloj kreskas, kaj kun ili la koncentriĝo de la produktadrimedoj, en la proporcio laŭ kiu ili estas alikvotaj partoj de la socia ĉiomkapitalo. Samtempe partoj de la origina kapitalo disiĝas kaj funkcias kiel novaj sendependaj kapitaloj. Ĉe tio ludas gravan rolon interalie la divido de la havaĵo en kapitalismaj familioj. Kun la akumulado de la kapitalo kreskas do ankaŭ pli aŭ malpli la nombro da kapitalistoj. Du punktoj karakterizas tiun specon de koncentriĝo, kiu rekte baziĝas sur la akumulado aŭ pli ĝuste estas identa kun ĝi. Unue: La kreskanta koncentriĝo de la sociaj produktadrimedoj en la manoj de individuaj kapitalistoj estas, sub alie senŝanĝaj cirkonstancoj, limigita per la kreskogrado de la socia riĉaĵo. Due: La en ĉiu aparta produktadsfero hejma parto de la socia kapitalo estas dividita inter multaj kapitalistoj, kiuj staras unu al la alia kiel sendependaj kaj inter si konkurencantaj varproduktistoj. La akumulado kaj la ĝin akompananta koncentriĝo estas do ne nur diserigitaj sur multaj punktoj, sed la kresko de la funkciantaj kapitaloj estas kontraŭata de la estiĝo de novaj kaj fendiĝo de malnovaj kapitaloj. Do, kvankam la akumulado prezentiĝas unuflanke kiel kreskanta koncentriĝo de la produktadrimedoj kaj de la komando super la laboro, ĝi prezentiĝas aliflanke kiel reciproka repuŝado de multaj kapitaloj.

Al tiu diserigo de la socia ĉiomkapitalo en multajn individuajn kapitalojn, aŭ al la reciproka repuŝado de ĝiaj eroj, kontraŭefikas ilia altiro. Tiu jam ne estas simpla koncentriĝo de la produktadrimedoj kaj de komando super la laboro, identa kun la akumulado. Ĝi estas koncentriĝo de jam estiĝintaj kapitaloj, nuligo de ilia individua memstareco, eksproprietigo de kapitalisto fare de kapitalisto, transformado de multaj malgrandaj en malmultajn pli grandajn kapitalojn. Tiu procezo distingiĝas disde la unua per tio, ke ĝi premisas nur ŝanĝitan disdividon de la jam ekzistantaj kaj funkciantaj kapitaloj, ke ĝia agospaco estas do ne limigita de la absoluta kresko de la socia riĉaĵo aŭ de la absolutaj limoj de la akumulado. La kapitalo ŝvelas ĉi tie en unu mano al grandaj kvantoj, ĉar ĝi tie en multaj manoj perdiĝas. Tio estas la vera centralizo kontraste al la akumulado kaj

koncentriĝo.

Ne eblas ĉi tie detale prezenti la leĝojn de tiu centralizo. Mallonga aludo al certaj faktoj devas sufiĉi. La konkurencbatalo estas farata per malplikostigo de la varoj. La malmultekosteco de la varoj dependas, ĉe alie senŝanĝaj cirkonstancoj, de la produktivo de la laboro, sed tiu siavice de la skalo de la produktado. La pli grandaj kapitaloj batas do la pli malgrandajn. Ni memoru krome, ke kun la disvolviĝo de la kapitalisma produktadmaniero kreskas la minimuma grando de la individua kapitalo necesa por funkciigi entrepenon en normalaj kondiĉoj. Pro tio la malgrandaj kapitaloj alfluas en produktadsferojn, kiujn la granda industrio alproprigis al si ankoraŭ nur sporade aŭ ne perfekte. Tie la konkurenco furiozas en rekta proporcio al la nombro kaj en inversa proporcio al la grando de la konkurencantaj kapitaloj. Ĝi finiĝas ĉiam kun la pereo de multaj pli malgrandaj kapitalistoj, kies kapitaloj transiras parte en la manon de la venkinto, parte pereas. Aparte de tio, kun la kapitalisma produktado formiĝas tute nova potenco, la kreditsistemo, kiu komence enŝteliĝas diskrete, kiel modesta helpo de akumulado, tiras per nevideblaj fadenoj la tra la surfaco de la socio en pli aŭ malpli grandaj kvantoj diserigitajn monrimedojn en la manojn de individuaj aŭ asociiĝintaj kapitalistoj, sed baldaŭ fariĝas nova kaj terura armilo en la konkurencbatalo kaj fine transformiĝas en monstran socian meĥanismon por centralizo de la kapitaloj.

En la sama mezuro kiel la kapitalisma produktado kaj akumulado evoluas konkurenco kaj kredito, la du plej potencaj leviloj de la centralizado. Apud tio la progreso de la akumulado pliigas la centralizeblan materialon, do la individuajn kapitalojn, dum la etendiĝo de la kapitalisma produktado kreas jen la socian bezonon, jen la teĥnikajn rimedojn de tiu gigantaj industriaj entreprenoj, kies funkciado postulas antaŭan centraliziĝon de la kapitalo. Nuntempe la reciproka altiro de la individuaj kapitaloj kaj la tendenco al centralizo estas pli fortaj ol iam ajn antaŭe. Sed kvankam la relativa etendiĝo kaj energio de la centralizanta moviĝo estas certagrade determinata de la jam atingita grando de la kapitalisma riĉaĵo kaj la supereco de la ekonomia meĥanismo, tamen la progreso de la centralizo tute ne dependas de la pozitiva kresko de la grando de la socia kapitalo. Kaj speciale tio distingas la centralizon disde la koncentriĝo, kiu estas nur alia esprimo por la reproduktado je etendita skalo. La centraliĝo povas okazi per nur ŝanĝita disdivido de jam ekzistantaj kapitaloj, per simpla ŝanĝo de la kvanta grupiĝo de la partoj de la socia kapitalo. La kapitalo povas ĉi tie kreski al grandegaj kvantoj en unu mano, ĉar ĝi estas

tie eltirata el multaj unuopaj manoj. En iu branĉo la centraligo atingus sian plej ekstreman limon, se ĉiuj en ĝi investitaj kapitaloj estus kunfanditaj en unu unuopan kapitalon.[105] En iu socio tiu limo estus atingita nur en la momento, kiam la tuta socia kapitalo estus unuigita en la mano, ĉu de unu sola kapitalisto, ĉu en unu sola kapitalista societo.

La centralizo kompletigas la faron de la akumulado, per tio ke ĝi kapabligas la industriajn kapitalistojn etendi la skalon de siaj operacioj. Egale, ĉu tiu lasta rezulto estas la sekvo de akumulado aŭ de centralizo, ĉu la centralizo okazas perforte per aneksado – kie certaj kapitaloj fariĝas tiom dominantaj gravitocentroj por aliaj, ke ili rompas ties individuan kunteniĝon kaj poste altiras la unuopajn romperojn – aŭ ĉu la kunfandiĝo de multaj jam formitaj respektive formiĝantaj kapitaloj okazas per la pli glata proceduro de formado de akcisocietoj – la ekonomia efiko restas la sama. La kreskinta etendiĝo de la industriaj establoj fariĝas ĉie la ekirpunkto de ampleksa organizado de la ĉiomlaboro de multaj, de pli larĝa disvolvado de iliaj materiaj movfortoj, t.e. de la progresanta transformado de unuopaj kaj kutimmaniere funkciantaj produktadprocezoj en socie kombinitajn kaj science aranĝitajn produktadprocezojn.

Tamen estas klare, ke la akumulado, la iom-post-ioma pliigo de la kapitalo per la reproduktado, kiu el la cirkla formo transiras en spiralon, estas tute malrapida procedo, kompare kun la centralizo, kiu bezonas nur ŝanĝi la kvantan grupiĝon de la integraj partoj de la socia kapitalo. La mondo estus ankoraŭ sen fervojoj, se ĝi devintus atendi tiom longe ĝis la akumulado estus tiom grandiginta kelkajn unuopajn kapitalojn ke ili taŭgus por konstruado de fervojo. La centralizo, male, sukcesis tion, per la akcisocietoj, en manturno. Kaj dum la centralizo tiel pliigas kaj akcelas la efikojn de la akumulado, ĝi etendas kaj akcelas samtempe la ŝanĝegojn en la teĥnika konsisto de la kapitalo, kiuj pliigas ties konstantan parton surkoste de ĝia varia parto kaj per tio malpliigas la relativan postulon je laboro.

La amasoj de kapitalo, kunfanditaj de unu tago al alia per centralizo, reproduktiĝas kaj pliiĝas kiel la aliaj, sed pli rapide, kaj per tio fariĝas novaj potencaj leviloj de la socia akumulado. Se oni do parolas pri la progreso de la socia akumulado, tiam estas – nuntempe – la efikoj de la centralizo silente inkluditaj.

105*Aldono al la 4-a eldono:* La plej novaj anglaj kaj usonaj trustoj jam alstrebas tiun celon, per tio ke ili provas kunigi almenaŭ ĉiujn grandajn entreprenojn de iu branĉo al unu granda akcikompanio kun praktika monopolo. – F. E.

La kromkapitaloj, formitaj dum la normala akumulado (vidu ĉapitron 22, sekcio 1), servas unuavice kiel rimedo por ekspluatado de novaj inventoj kaj malkovroj, entute de industriaj perfektiĝoj. Sed ankaŭ la malnova kapitalo atingas kun la tempo la momenton de sia kompleta renoviĝo de kapo ĝis piedoj, kiam ĝi alihaŭtiĝas kaj renaskiĝas en la perfektigita teĥnika formo, en kiu malpli granda kvanto da laboro sufiĉas por movi pli grandan kvanton da maŝinaro kaj da krudmaterialoj. La el tio nepre sekvanta malpliiĝo de postulo je laboro kompreneble akriĝas, ju pli la kapitaloj trairantaj tiun renoviĝprocezon estas jam amasiĝintaj pro sia centraliziĝo.

Do, unuflanke la kromkapitalo, estiĝinta dum la akumulado, altiras, proporcie al sia grando, ĉiam malpli da laboristoj. Aliflanke la malnova kapitalo, periode en nova konsisto reproduktita, elpelas pli kaj pli da laboristoj antaŭe de ĝi dungitaj.

# 3. Progresanta produktado de relativa superloĝantaro aŭ de industria rezervarmeo

La akumulado de la kapitalo, kiu origine aperis nur kiel ĝia kvanta renoviĝo, okazas, kiel ni vidis, en konstanta kvalita ŝanĝo de sia konsisto, en konstanta pliiĝo de sia konstanta parto surkoste de sia varia parto.[106]

La specife kapitalisma produktadmaniero, la disvolviĝo de la produktadforto de la laboro, kiu kongruas al ĝi, la per ĝi kaŭzita ŝanĝo en la organika konsisto de la kapitalo ne nur sampaŝas kun la progreso de la akumulado aŭ kun la kresko de la socia riĉaĵo. Ili iras senkompare pli rapide, ĉar la simpla akumulado aŭ la absoluta etendado de la ĉiomkapitalo estas akompanata de la centraliziĝo de siaj individuaj elementoj, kaj la teĥnika ŝanĝego de la kromkapitalo estas akompanata de teĥnika ŝanĝego de la origina kapitalo. Pro tio, kun la progreso de la akumulado la proporcio de konstanta al la varia kapitalparto, se ĝi estis origine 1:1, ĝi ŝanĝiĝas al 2:1, 3:1, 4:1, 5:1, 7:1 ktp, tiel, ke kun la kresko de la kapitalo,

106 *Noto al la 3-a eldono:* – En la manekzemplero de Markso staras ĉi tie la marĝena rimarko: „Ĉi tie rimarkenda por io estonta: Se la etendiĝo estas nur kvanta, tiam ĉe granda kaj malgranda kapitalo en la sama branĉo la profitoj estas proporciaj al la grandoj de la antaŭpagitaj kaptialoj. Se la kvanta etendiĝo efikas kvalite, tiam kreskas samtempe la kvoto de la profito por la pli granda kapitalo. – F. E.

anstataŭ ½ de ĝia tuta valoro laŭgrade nur $^{1}/_{3}$, $^{1}/_{4}$, $^{1}/_{5}$, $^{1}/_{6}$, $^{1}/_{8}$ ktp estas transformata en laborforton, kaj aliflanke $^{2}/_{3}$, $^{3}/_{4}$, $^{4}/_{5}$, $^{5}/_{6}$, $^{7}/_{8}$ ktp en produktadrimedojn. Ĉar la postulo je laboro ne estas determinata per la grando de la tuta kapitalo, sed per tiu de ĝia varia parto, ĝi falas do progrese kun la kresko de la tuta kapitalo, anstataŭ, kiel antaŭe supozate, kreski proporcie al ĝi. Ĝi falas proporcie al la grando de la tuta kapitalo kaj en akcelita progreso kun la kresko de tiu grando. Kun la kresko de la tuta kapitalo kreskas ja ankaŭ ĝia varia parto, aŭ la en ĝi enkorpigita laborforto, sed en konstante malkreskanta proporcio. La interaj paŭzoj, en kiuj la akumulado efikas nur kiel etendo de la produktado sur donita teĥnika bazo, mallongiĝas. Necesas ne nur akumulado de la tuta kapitalo akcelata en kreskanta progresado por sorbi kroman nombron da laboristoj en donita grando aŭ eĉ, pro la konstanta metamorfozo de la malnova kapitalo, teni la jam funkciantajn. Tiu kreskanta akumulado siavice fariĝas fonto de novaj ŝanĝoj en la konsisto de la kapitalo, aŭ ree akcelita malpliigo de ĝia varia parto, kompare kun la konstanta. Tiu relativa malkresko de ĝia varia parto, akcelata kun la kresko de la tuta kapitalo kaj pli rapide akcelata ol ĝia propra kresko, ŝajnas aliflanke esti ĉiam pli rapida absoluta kresko de la laborista loĝantaro ol tiu de la varia kapitalo aŭ de ĝiaj dungrimedoj. Sed fakte la kapitalisma akumulado produktas, proporcie al sia energio kaj al sia grando, konstante relativan, do por la mezumaj plivalorigbezonoj de la kapitalo superan, pro tio superfluan aŭ superan laboristan loĝantaron.

Se oni konsideras la socian ĉiomkapitalon, la moviĝo de ĝia akumulado kaŭzas jen periodan ŝanĝon, jen ĝiaj elementoj dispartiĝas samtempe super la diversaj produktadsferoj. En kelkaj sferoj okazas ŝanĝo en la konsisto de la kapitalo sen kresko de ĝia absoluta grando, pro nura koncentriĝo; en aliaj la absoluta kresko de la kapitalo estas ligita kun absoluta malkresko de ĝia varia parto aŭ de la en ĝi sorbita laborforto; en aliaj la kapitalo jen kreskas plu sur sia donita teĥnika bazo kaj altiras kroman laborforton en proporcio al sia kresko, jen okazas organika ŝanĝo kaj ĝia varia parto malpliiĝas; en ĉiuj sferoj la kresko de la varia kapitalparto kaj do de la kvanto de dungitaj laboristoj estas ĉiam ligita kun fortaj fluktuadoj kaj provizora produktado de superloĝantaro, egale ĉu tiu alprenas la pli okulfrapan formon de elĵeto de jam dungitaj laboristoj aŭ la malpli rimarkeblan, sed ne malpli efikan formon de pli malfacila sorbado de kroma laborista loĝantero tra ĝiaj kutimaj kanaloj.[107] Kun la grando de la

107 La popolnombrado por Anglio kaj Kimrio montras i.a.:

Ĉiuj en la kampkulturo laborantaj personoj (inkluzive de proprietuloj, farm-

jam funkcianta socia kapitalo kaj kun la grado de ĝia kresko, kun la etendo de la skalo de produktado kaj de la kvanto de funkciantaj laboristoj, kun la evoluo de la produktadforto de ilia laboro, kun la pli larĝa kaj pli plena fluado de ĉiuj fontoj de riĉaĵoj etendiĝas ankaŭ la skalo, laŭ kiu pli granda altiro de laboristoj fare de la kapitalo estas ligita kun ilia pli granda elĵeto, kreskas la rapideco de la ŝanĝoj en la organika konsisto de la kapitalo kaj de ĝia teĥnika formo, kaj ŝvelas la regiono de la produktadsferoj, kiuj jen samtempe, jen alterne estas enigitaj en tiun procezon. Kun la akumulado de la kapitalo, akumulado produktata de la laborista loĝantaro mem, tiu produktas do en kreskanta kvanto la rimedojn de sia propra superfluigo.[108] Tiu estas loĝantarleĝo propra al la kapitalisma pro-

istoj, ĝardenistoj, paŝtistoj ktp) – 1851: 2.011.447, 1861: 1.924.110, malkresko: 87.338. Komblana teksado – 1851: 102.714 personoj, 1861: 79.242; silkfabriko – 1851: 111.940, 1861: 101.678; kotonpresistoj – 1851: 12.098, 1861: 12.556, la malgranda kresko malgraŭ la grandega etendiĝo de tiu industrio implicas grandan proporcian malkreskon de la nombro da dungitaj laboristoj. Ĉapelistoj – 1851: 15.957, 1861: 13.814; pajloĉapel- kaj ĉapfaristoj – 1851: 20.393, 1861: 18.176; maltistoj – 1851: 10.566, 1861: 10.677; kandelistoj – 1851: 4.949, 1861: 4.686. Tiu malkresko ŝuldiĝas i.a. al la disvastiĝo de la gaslumado. Kombilfaristoj – 1851: 2.038, 1861: 1.478; lignosegistoj – 1851: 30.552, 1861: 31.647, malforta kresko pro la multiĝo de segmaŝinoj; najlofaristoj – 1851: 26.940, 1861: 26.130, malkresko pro la maŝina konkurenco; laboristoj en stan- kaj kupro-minejoj – 1851: 31.360, 1861: 32.041. Male: kotonŝpinejoj kaj teksejoj – 1851: 371.777, 1861: 456.646; karbminejoj – 1851: 183.389, 1861: 246.613. „La pliiĝo de laboristoj estas ĝenerale plej granda ekde 1851 en tiuj branĉoj, en kiuj la maŝinaro ĝis tiam ankoraŭ ne estis sukcesa uzata. („*Census of England and Wales for 1961*", vol. III, Londono, 1863, p. 35-39)

108 La leĝo de la progresanta malpliiĝo de la relativa grando de la varia kapitalo, apud ĝiaj efikoj al la situacio de la dunglaborista klaso, estas de kelkaj elstaraj ekonomikistoj de la klasika skolo pli antaŭsentita ol komprenita. La plej granda merito apartenas al John Barton, kvankam li, kiel ĉiuj aliaj, kunmiksas la konstantan kapitalon kun la fiksa, la varian kun la cirkulanta. Li diras. „La postulo je laboro dependas de la pliigo de la cirkulanta kaj ne de la fiksa kapitalo. Se ĝustus, ke la proporcio inter tiuj du specoj de la kapitalo estas en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj cirkonstancoj la sama, tiam ja sekvus el tio, ke la nombro da okupataj laboristoj dependas de la riĉaĵo de la ŝtato. Sed tia aserto havas eĉ ne la ŝajnon de probableco. En la mezuro, laŭ kiu la natursciencoj estas flegataj kaj la civilizacio disvastiĝas, la fiksa kapitalo kreskas en proporcio de la cirkulanta ĉiam pli kaj pli. La sumo de fiksa kapitalo uzata ĉe la produktado de peco da brita muslino estas almenaŭ centoble, sed verŝajne miloble pli granda ol tiu uzata por produktado de simila peco da hindia muslino. Kaj la parto de la cirkulanta kapitalo estas centoble aŭ miloble pli

duktadmaniero, kiel fakte ĉia aparta historia produktadmaniero havas siajn apartajn, historie validajn loĝantarleĝojn. Abstrakta loĝantarleĝo – populacileĝo – ekzistas nur por planto kaj besto, se la homo ne historie intervenas.

Sed se superloĝantaro de laboristoj estas necesa produkto de la akumulado aŭ de la disvolvado de la riĉeco sur kapitalisma bazo, tiam tiu superloĝantaro fariĝas inverse levilo de la kapitalisma akumulado, eĉ ekzistadkondiĉo de la kapitalisma produktadmaniero. Ĝi prezentiĝas kiel disponebla industria rezervarmeo, kiu apartenas al la kapitalo same absolute, kvazaŭ tiu estus bredinta ĝin proprakoste. Ĝi disponigas por la ŝanĝiĝantaj plivalorigbezonoj de la kapitalo la ĉiam pretan ekspluateblan hommaterialon, sendepende de la limoj de la reala kresko de la loĝantaro. Kun la akumulado kaj la ĝin akompananta disvolvado de la produktadforto de la laboro, kreskas la subita ekspansiforto de la kapitalo, ne nur, ĉar la elasteco de la funkcianta kapitalo kreskas, kaj la absoluta riĉaĵo, el kiu la kapitalo estas nur elasta parto, ne nur, ĉar la kredito, sub ajna aparta stimulo, rapidege disponigas nekutiman parton de tiu riĉaĵo al la produktado kiel kromkapitalon. La teĥnikaj kondiĉoj de la produktadprocezo mem, maŝinaro, transportiloj ktp, ebligas, plej grandskale, la plej rapidan transformadon de plusprodukto en kromajn produktadrimedojn. La amaso da socia riĉaĵo, kiu superabundas kun la progreso de la akumulado kaj transformeblas en kromkapitalon, freneze penetras en malnovajn produktadbranĉojn, kies merkato subite larĝiĝas, aŭ en nove malfermitajn, kiel fervojojn ktp, kies bezono devenas el la evoluo de la malnovaj. En ĉiaj ĉi kazoj grandaj homamasoj devas esti ĵeteblaj sur la decidajn punktojn, sen

malgranda … Se la tutaĵo de la jaraj ŝparaĵoj estus aldonita al la fiksa kapitalo, tiam ilia efiko ne estus pli alta postulo je laboro.” (John Barton, „*Observations on the circumstances which influence the Condition of the labouring Classes of Society*”, Londono, 1817, p. 16, 17) „La sama kaŭzo, kiu kreskigas la netan enspezon (*revenue*) de lando, povas samtempe kaŭzi superfluon je loĝantaro kaj malbonigi la situacion de la laboristo.” (Ricardo, l.c., p. 469) Kun la pliiĝo de la kapitalo „la postulo” (je laboro) „proporcie malpliiĝos”. (saml., p. 480) „La sumo de kapitalo destinita por konservado de laboro povas ŝanĝiĝi, sendepende de iaj ŝanĝoj en la tuta sumo de la kapitalo … Grandaj fluktuadoj en amplekso de dungeco kaj granda mizero povas plioftiĝi en la mezuro, laŭ kiu la kapitalo mem pli riĉiĝas.” (Richard Jones, „*An Introductory Lecture on Pol. Econ.*”, Londono, 1833, p. 12) „Postulo” (je laboro) „kreskos … ne en la proporcio de la akumulado de la ĉiomkapitalo … Pro tio, ĉia pliiĝo de la nacia kapitalo destinita al reproduktado en la socia progreso havos ĉiam malpli grandan influon sur la situacio de la laboristo.” (Ramsay, l.c, p. 90, 91)

interrompi la skalon de produktado en aliaj sferoj. La superloĝantaro liveras ilin. La karakteriza evoluo de la moderna industrio, la formo de dekjara ciklo – interrompata de pli malgrandaj osciliĝoj – de periodoj de meza vigleco, produktado sub alta premo, krizo kaj stagnado, baziĝas sur la konstanta formiĝo, pli aŭ malpli granda sorbiĝo kaj restariĝo de la industria rezervarmeo aŭ superloĝantaro. La diversaj fazoj de la industria ciklo siavice rekrutas la superloĝantaron kaj fariĝas unu el ties plej energiaj reproduktad-agantoj.

Tiu aparta irado de la moderna industrio, kiun ni renkontas en nenia antaŭa epoko de la homaro, estis ankaŭ en la infanepoko de la kapitalisma produktado malebla. La konsisto de la kapitalo ŝanĝiĝis nur iom post iom. Do, al ĝia akumulado ĝenerale respondis proporcia kresko de la postulo je laboro. Malrapide kiel la progreso de ĝia akumulado, kompare kun la moderna epoko, ĝi trafis sur naturaj baroj de la ekspluatebla laboristaro, kiuj estis forigeblaj nur per perfortaj rimedoj, kiujn ni poste mencios. La subita kaj skua ekspansio de la produktada skalo estas la premiso de ĝia subita kuntiriĝo; tiu siavice kaŭzas la unuan, sed la unua estas malebla sen disponebla hommaterialo, sen pliigo de laboristoj sendependa de la kresko de la loĝantaro. Ĝi estas kreata de la simpla procezo, kiu konstante „liberigas” parton de la dungitaj laboristoj, per metodoj, kiuj malpliigas la nombron da okupataj laboristoj en proporcio de la pliigita produktado. La tuta movformo de la moderna industrio elkreskas do el la konstanta transformado de parto de la laborista loĝantaro en senlaborajn aŭ duondungitajn manojn. La supraĵeco de la politika ekonomio montriĝas interalie en tio, ke ĝi interpretas la ekspansion kaj kuntiriĝon de la kredito, la nuran simptomon de la ŝanĝiĝantaj periodoj de la industria ciklo, kiel ties kaŭzon. Same kiel astroj, post esti lanĉitaj en certan moviĝon, ĉiam ripetas tiun, tiel la socia produktado, ekde kiam ĝi estis lanĉita en tiun moviĝon de alternanta ekspansio kaj kuntiriĝo. Efikoj fariĝas siavice kaŭzoj, kaj la sortoŝanĝoj de la tuta procezo, kiu ĉiam reproduktas siajn proprajn kondiĉojn, alprenas la formon de periodeco.[109] Kiam tiu

109 *En la franca eldono (Parizo, 1873) troviĝas ĉi tie (p. 280) jena paragrafo enmetita de Markso:* „Sed nur ekde la epoko, kiam la meĥanika industrio estis jam tiom profunde enradikiĝinta, ke ĝi havis dominantan influon sur la tuta nacia produktado; kiam pere de ĝi la ekstera komerco komencis superi la internan komercon; kiam la mondmerkato iom post iom trudiĝis al grandaj regionoj en la nova mondo, en Azio kaj en Aŭstralio; kiam fine la industriaj nacioj, kiuj eniris la arenon, estis jam sufiĉe multnombraj – nur de tiam datiĝas tiuj ĉiam reproduktiĝantaj cikloj, kies sinsekvaj fazoj daŭras jarojn kaj kiuj ĉiam venas al ĝenerala krizo, kiu estas fino de ciklo kaj ekirpunkto de nova ciklo. Ĝis nun la perioda daŭro de tiaj cikloj estas dek aŭ dek unu jaroj,

periodeco estas solidiĝinta, tiam eĉ la politika ekonomio komprenas la produktadon de relativa – do koncerne la mezuman plivalorigbezonon de la kapitalo – superloĝantaron kiel vivkondiĉon de la moderna industrio.

„Ni supozu”, diras s-ro Merivale, eksa profesoro pri politika ekonomio en Oksfordo, poste oficisto de la angla koloni-ministrejo, „ni supozu, ke okaze de krizo la nacio faras fortostreĉon por seniĝi per elmigrado je proksimume 100.000 superfluaj brakoj, kio estus la sekvo? Ke ĉe la unua reveno de la postulo je laboro estus manko. Kiom ajn rapida la reproduktado de homoj povas esti, ĝi bezonas ĉiukaze la interspacon de unu generacio por anstataŭigi plenkreskajn laboristojn. Nu, la profitoj de niaj fabrikistoj dependas ĉefe de la kapablo ekspluati la favoran momenton de vigla postulo kaj tiel kompensi la periodon de paraliziĝo. Tiu kapablo estas certigita al ili per la komando super maŝinaro kaj manlaboro. Ili devas trovi disponeblajn manojn; ili devas esti kapablaj, se necese, pli alte streĉi aŭ malstreĉi la aktivecon de iliaj operacioj, laŭ la stato de la merkato, aŭ ili povas en la batalo de konkurenco simple ne konservi la superecon, sur kiu baziĝas la riĉeco de tiu ĉi lando.”[110]

Eĉ Malthus rekonas en la superloĝantaro, kiun li interpretas, laŭ sia limigita horizonto, el absoluta trokresko de la laborista loĝantaro, ne el ĝia relativa superfluigado, neceson de la moderna industrio. Li diras:

„Saĝaj kutimoj koncerne la geedzajn rilatojn, se ili estas troigitaj inter la laborista klaso de lando, kiu dependas ĉefe de manufakturo kaj komerco, estus al ĝi malutila … Laŭ la naturo de la loĝantaro, kromaj laboristoj ne livereblas al la merkato, sekve al aparta postulo, ĝis la fino de 16 aŭ 18 jaroj, kaj la transformado de enspezo [*renevue*] en kapitalon per ŝparado povas okazi multe pli rapide; lando estas ĉiam elmetita al la ebleco ke ĝia laborfonduso kreskas pli rapide ol la loĝantaro.”[111]

Post kiam la politika ekonomio tiel deklaris la konstantan produktadon de relativa superloĝantaro de laboristoj neceso de la kapitalisma akumulado, ĝi metas – adekvate en la figuro de maljuna virgulino – en la buŝon

---

sed ekzistas nenia kialo por konsideri tiun nombron konstanta. Male, el la leĝoj de la kapitalisma produktado, kiel ni ĵus montris, oni devas konkludi, ke ĝi estas varia kaj ke la periodo de la cikloj laŭŝtupe mallongiĝos.”

110 H. Merivale, „*Lectures on Colonization and Colonies*”, Londono, 1841 kaj 1842, vol. I, p. 146.

111 Malthus, „*Princ. of Pol. Econ.*”, p. 215, 319, 320. En tiu verko Malthus fine malkovras, per tiu de Sismondi, la belan triopecon de la kapitalisma produktado: superproduktado – superloĝantaro – superkonsumado, efektive tri tre delikataj monstroj! Kp. F. Engels: „*Umrisse zu einer Kritik der Nationalökonomie* [F. Engelso: „Skizoj pri kritiko de la nacia ekonomio”], l.c., p. 107 sj <vidu MEW, vol. 1, p. 518 ĝis 521>

de sia „bela idealo" de kapitalisto jenajn vortojn direktitajn al la „superfluaj" surstratigitoj fare de ilia propra kreaĵo de kromkapitalo:

> „Ni fabrikistoj faras por vi kion ni povas, per tio ke ni pliigias la kapitalon, el kiu vi devas vivteni vin; kaj vi devas fari la ceteron, per tio ke vi adaptas vian nombron al la rimedoj por vivtenado."[112]

Al la kapitalisma produktado tute ne sufiĉas la kvanto de disponebla laborforto, kiun la natura alkresko de la loĝantaro liveras. Ĝi bezonas por sia libera ludo industrian rezervarmeon sendependan de tiu natura baro.

Ĝis nun ni ekiris de la supozo, ke la pliiĝo aŭ malpliiĝo de la varia kapitalo precize respondas al la pliiĝo aŭ malpliiĝo de la nombro de okupataj laboristoj.

Ĉe senŝanĝa aŭ eĉ malpli granda nombro de la laboristoj sub ĝia komando la varia kapitalo tamen kreskas, se la individua laboristo liveras pli da laboro kaj pro tio lia salajro kreskas, kvankam la laborprezo restas senŝanĝa aŭ eĉ malaltiĝas, nur pli malrapide ol la kvanto de laboro kreskas. La alkresko de la varia kapitalo fariĝas tiam indico de pli da laboro, sed ne de pli da okupataj laboristoj. Ĉiu kapitalisto havas la absolutan intereson elpremi certan laborkvanton el malpli granda nombro de laboristoj ol same malmultekoste aŭ eĉ pli malmultekoste el pli granda nombro da laboristoj. En la lasta kazo la elspezo de konstanta kapitalo kreskas proporcie al la kvanto de la funkciigita laboro, en la unua kazo multe pli malrapide. Ju pli grandas la skalo de la produktado, des pli decida estas tiu motivo. Ĝia forto kreskas kun la akumulado de la kapitalo.

Ni vidis, ke la evoluo de la kapitalisma produktadmaniero kaj de la laborproduktivo – samtempe kaŭzo kaj efiko de la akumulado – ebligas al la kapitalisto, per la sama elspezo de varia kapitalo funkciigi pli da laboro per pli granda malintensa aŭ intensa ekspluatado de la individuaj laborfortoj. Ni vidis krome, ke li aĉetas per tiu sama kapitalvaloro pli da laborfortoj, per tio ke li iom post iom anstataŭigas lertajn per pli mallertaj laboristoj, maturajn per nematuraj, virajn per inaj aŭ infanaj.

Do, unuflanke, en la daŭro de la akumulado, pli granda varia kapitalo funkciigas pli da laboro sen dungi pli da laboristoj, aliflanke samgranda varia kapitalo funkciigas pli da laboro per la sama kvanto da laborforto kaj fine pli da malpli valora per forigo de pli valora[113].

---

112 Harriet Martineau, „*The Manchester Strike*", 1832, p. 101.

113 *En la originalo: „… mehr niedere Arbeitskräfte durch Verdrängung höherer."*

La produktado de relativa superloĝantaro aŭ la maldungo de laboristoj pro tio progresas ankoraŭ pli rapide ol la kun la progreso de la akumulado akcelita teĥnika revoluciado de la produktadprocezo kaj la responda proporcia malkresko de la varia kapitalo kompare kun la konstanta. Se la produktadrimedoj, kun sia kreskado je amplekso kaj efiko, fariĝas en malpli alta grado laborrimedo de la laboristoj, tiu proporcio modifiĝas siavice per tio, ke en la proporcio, en kiu la laborproduktivo kreskas, la kapitalo pliigas sian provizon je laboro pli rapide ol sian postulon je laboristoj. La superlaboro de la okupata parto de la laborista klaso ŝveligas la vicojn de ties rezervo, dum inverse la pli granda premo, kiun la lasta per sia konkurenco faras al la unua, devigas tiun al superlaboro kaj al submetiĝo sub la diktatoj de la kapitalo. La kondamno de parto de la laborista klaso al deviga nenifarado per superlaborado de la alia parto kaj inverse, fariĝas riĉiĝ-rimedo de la unuopa kapitalisto[114] kaj samtempe akcelas la produktadon de la industria rezervarmeo en skalo kongrua kun

(„… pli da malpli altaj laborfortoj per forigo de pli altaj.”) -vl

114 Eĉ dum la kotonmanko de 1863 oni trovas en pamfleto de la kotonŝpinistoj de *Blackburn* akran denuncon kontraŭ la superlaboro, kiu trafis pro la fabrikleĝo kompreneble nur la plenkreskajn virajn laboristojn. „Oni postulis en tiu fabriko de la plenkreskaj laboristoj dekdu- ĝis dektri-horan laboron tage, kvankam estas centoj devigataj al nenifarado, sed kiuj ŝatus labori dum parto de la labortempo por povi vivteni siajn familiojn kaj antaŭmalhelpi al siaj laborfratoj antaŭtempan morton pro superlaboro.” „Ni”, pluas la teksto, „ŝatus demandi, ĉu tiu praktiko, laborigi supertempon al nombro da manoj, ebligas iel bonan etoson inter mastroj kaj servistoj. Tiuj, kiuj devas labori kromtempe, sentas la maljustecon same kiel tiuj, kiuj estas kondamnitaj al deviga nenifarado (*condemned to forced idleness*). En la distrikto ekzistas sufiĉe da laboro por certigi al ĉiuj partan dungon, se ĝi estas juste distribuita. Ni postulas nur ion, kio estas ĝusta, instigante niajn mastrojn laborigi ĝenerale nur mallongan tempon, almenaŭ dum la nuna stato de la afero daŭras, anstataŭ trolaborigi parton, dum la alia parto estas per manko de laboro devigata vivteni sin per almozoj.” („*Reports of Insp. of Fact., 31st Oct*., 1863”, p. 8) – La aŭtoro de la „*Essay on Trade and Commerce*” komprenas la efikon de relativa superloĝantaro al la okupataj laboristoj laŭ sia kutime senmanka burĝ-instinkto. „Alia kaŭzo de la nenifarado (*idleness*) en tiu ĉi reĝlando estas la manko de sufiĉa nombro da laborantaj manoj. Ĉiam, kiam ia nekutima postulo je fabrikaĵoj la kvanto de laboristoj fariĝas nesufiĉa, la laboristoj sentas sian propran gravecon kaj volas sentigi ĝin ankaŭ al siaj mastroj; estas mirige; sed la pensmaniero de tiuj uloj estas tiom malvirta, ke en tiaj okazoj grupoj da laboristoj kombiniĝis por embarasi siajn mastrojn per tio ke ili dum tuta tago kune faris nenion.” („*Essay* ktp”, p. 27, 28) Ĉar la uloj postulis altigon de sia salajro.

la socia akumulado. Kiom tiu elemento gravas por la estigo de la relativa superloĝantaro, tion pruvas ekz-e Anglio. Ĉiaj teĥnikaj rimedoj por „ŝpari” laboron estas kolosaj. Tamen, se morgaŭ la laboro estus ĝenerale limigita al racia mezuro kaj gradigita por la diversaj tavoloj de la laborista klaso laŭ aĝo kaj sekso, tiam la ekzistanta laborista loĝantaro estus absolute nesufiĉa por daŭrigi la nacian produktadon laŭ la nuna skalo. La granda plimulto de la nun „neproduktivaj” laboristoj transformendus en „produktivajn”.

Se oni konsideras ilin kiel tutaĵon, la ĝeneralaj moviĝoj de la salajro estas reguligataj ekskluzive de kresko kaj malkresko de la laborista rezervarmeo, kiuj respondas al la periodaj ŝanĝoj de la industria ciklo. Ili estas do ne determinataj de la moviĝo de la absoluta nombro de la laborista loĝantaro, sed de la ŝanĝiĝanta proporcio, en kiu la laborista klaso dividiĝas en aktiva armeo kaj rezervarmeo, de la kresko kaj malkresko de la relativa amplekso de la superloĝantaro, de la grado, laŭ kiu ĝi estas jen sorbata, jen maldungata. Por la moderna industrio kun ĝia dekjara ciklo kaj siaj periodaj fazoj, kiuj estas krome komplikigataj , en la pluiĝo de la akumulado, de ĉiam pli rapide sin sekvantaj malregulaj osciladoj, estus efektive bela leĝo, kiu reguligus la postulon kaj provizon de laboro ne per la alternantaj ekspansio kaj malekspansio de la kapitalo – do laŭ ties respektivaj plivalorigbezonoj, tiel ke la labormerkato estas jen relative neplena, ĉar la kapitalo ekspansias, jen superplena, ĉar ĝi malekspansias –, sed inverse farus la moviĝojn de la kapitalo dependaj de la absoluta moviĝo de la kvanto de loĝantero. Sed tio estas la dogmo de la ekonomiko. Laŭ ĝi, la salajro kreskas sekve al la kapitalakumulado. La pli alta salajro instigas al pli rapida pliiĝo de la laborista loĝantaro, kaj tiu daŭras ĝis kiam la labormerkato estas superplena, do la kapitalo, proporcie al la pliiĝo de laboristoj, fariĝis nesufiĉa. La salajro malkreskas, kaj nun la dorsa flanko de la medalo. Per la falanta salajro la laborista loĝantaro iom post iom malpliiĝas, tiel ke, kompare al ĝi, la kapitalo siavice fariĝas troa, aŭ, kiel aliaj klarigas tion, la falanta salajro kaj la laŭ tio kreskanta ekspluatado de la laboristo siavice akcelas la akumuladon, dum samtempe la malalta salajro moderigas la kreskon de la laborista klaso. Tiel reaperas la proporcio, laŭ kiu la propono de laboro estas malpli alta ol la postulo je laboro, la salajro kreskas ktp. Jen bela moviĝmetodo por la evoluinta kapitalisma produktado! Antaŭ ol pro la altigo de la salajro povus aperi ia ajn pozitiva kresko de la reale laborkapabla loĝantaro, la tempo estus plurfoje pasinta, dum kiu la industria kampanjo devas esti farita, la batalo gajnita aŭ perdita.

Inter 1849 kaj 1859 okazis, samtempe kun falantaj grenprezoj, praktike nur nominala salajroaltigo en la anglaj kampkulturaj distriktoj, ekz-e en *Wiltshire* la semajnsalajro kreskis de 7 al 8 ŝilingoj, en *Dorsetshire* la semajnsalajro kreskis de 7 aŭ 8 al 9 ŝ. ktp. Tio estis sekvo de la nekutime granda foriro de la kampkultura superloĝantaro, kaŭzita de milita postulo, amasa pliiĝo de fervojkonstruadoj, fabrikoj, minejoj ktp. Ju pli malalta la salajro, des pli alte esprimiĝas ĉia eĉ sensignifa elcenta kresko de ĝi. Se la semajnsalajro estas ekz-e 20 ŝilingoj kaj kreskas al 22, tiam je 10 elcentoj; se ĝi estas nur 7 ŝ. kaj kreskas al 9, tiam je $28^4/_7$ elcentoj, kio sonas tre konsiderinda. Ĉiukaze la farmistoj hurlis kaj eĉ la „*London Economist*”[115] babilis tute serioze pri „ĝenerala kaj konsiderinda altigo” koncerne tiujn malsat-salajrojn. Kiel reagis la farmistoj? Ĉu ili atendis, ĝis la kamp-laboristoj sekve al tiu brila pago pliiĝis tiom, ke ilia salajro devis ree fali, kiel la afero okazas en la ekonomika cerbo? Ili enkondukis pli da maŝinoj, kaj en turno de mano la laboristoj estis ree „troaj” en proporcio kiu sufiĉis eĉ al la farmistoj. Nun estis „pli da kapitalo” investita en la kampkulturo ol antaŭe kaj en pli produktiva formo. Per tio la postulo je laboro falis ne nur relative, sed absolute.

Tiu ekonomika fikcio konfuzas la leĝojn, kiuj reguligas la ĝeneralan moviĝon de la salajro aŭ la proporcion inter laborista klaso, do de la ĉiomlaborforto, kaj la socia ĉiomkapitalo, kun la leĝoj, kiuj distribuas la laboristan loĝantaron inter la apartaj produktadsferojn. Se ekz-e pro favora konjunkturo la akumulado en certa produktadsfero estas aparte vigla, la profitoj tie pli grandaj ol la mezumaj profitoj, kaj kromkapitalo ensuĉiĝas, tiam kompreneble kreskas postulo je laboro kaj la salajro. La pli alta salajro tiras pli grandan parton de la laborista loĝantaro en la favoratan sferon, ĝis tiu estas satigita je laborforto kaj la salajro por longa tempo refalas al sia antaŭa mezuma nivelo aŭ eĉ sub ĝin, se la alfluo estis tro granda. Tiam ne nur ĉesas la enmigrado de laboristoj en la koncernan branĉon, ĝi eĉ cedas al ĝia elmigrado. Ĉi tie la ekonomikisto kredas vidi, „kie kaj kiel”, per pliigo de salajro, absolutan pliigon de laboristoj, kaj per la absoluta pliigo de la laboristoj malpliigon de la salajro, sed li vidas fakte nur la lokan osciladon de la labormerkato de aparta produktadsfero, li vidas nur fenomenojn de distribuado de la laborista loĝantaro en la diversajn investsferojn de la kapitalo, laŭ ties ŝanĝiĝantaj bezonoj.

La industria rezervarmeo premas dum la periodoj de stagnado kaj de meza prospero al la aktiva laborista armeo kaj bridas ties postulojn dum la periodo de superproduktado kaj de paroksismo. La relativa superloĝantaro

115 „*Economist*”, 1860-01-21.

estas do la bazo, sur kiu la leĝo de postulo kaj propono de laboro moviĝas. Ĝi premas la agospacon de tiu leĝo en la limojn kiuj absolute konvenas al la akspluat- kaj dominat-avido de la kapitalo. Jen la momento por reveni al unu el la heroaĵoj de la ekonomika apologio. Ni memoru, ke, kiam per enkonduko de nova aŭ etendo de malnova maŝinaro peco de varia kapitalo estas transformata en konstantan, la ekonomika apologiisto interpretas tiun operacion, kiu „ligas" kapitalon kaj per tio „metas en liberon" [maldungas] laboristojn, inverse tiel ke ĝi liberigas kapitalon por la laboristo[116]. Nur nun oni povas plene aprezi la senhontaĵon de la apologiisto. Tio, kio estas metita en liberon [maldungita], estas ne nur la laboristoj rekte elŝovitaj de la maŝinoj, sed same ilia estonta anstataŭa skipo de la posta generacio kaj la – ĉe normala etendiĝo de la komerco sur la malnova bazo – regule sorbata kromkontingento da laboristoj. Ili ĉiuj estas nun „metitaj en la liberon", kaj ĉiu nova funkciema kapitalo povas disponi pri ili. Ĉu tiu altiras tiujn aŭ aliajn, la efiko sur la ĝenerala postulo je laboro estos nula, se tiu kapitalo ĝuste sufiĉas por liberigi la merkaton je same multaj laboristoj, kiom la maŝinoj elĵetis en ĝin. Se ĝi dungas malpli grandan nombron, tiam kreskas la kvanto de la „superfluaj"; se ĝi dungas pli grandan nombron, tiam la ĝenerala postulo je laboro kreskas nur laŭ la nombro de tiuj, kiuj estas pli dungitaj ol tiuj kiujn la maŝino maldungis. La impulso, kiun kromaj kapitaloj serĉantaj investon alie donintus al la ĝenerala postulo je laboro, estas do ĉiukaze neŭtraligita en la alteco de la nombro de tiuj laboristoj, kiujn la maŝino elĵetis. Tio signifas do, ke la meĥanismo de la kapitalisma produktado zorgas por tio, ke la absoluta alkresko de kapitalo ne estas akompanata de responda kresko de la ĝenerala postulo je laboro. Kaj tion la apologiisto nomas kompensaĵo por la mizero, la suferoj kaj la ebla pereo de la maldungitaj laboristoj dum la transira periodo, kiu tenas ilin kaptitaj en la industria rezervarmeo! La postulo je laboro ne identas kun la kresko de la kapitalo, nek la postulo je laboro kun la kresko de la laborista klaso. Ne temas pri situacio, en kiu du potencoj, sendependaj unu de la alia, efikus al si reciproke. La ĵetkuboj estas falsitaj.[117]

La kapitalo agas samtempe ĉe ambaŭ flankoj. Kiam ĝia akumulado unuflanke pliigas la postulon je laboro, ĝi pliigas aliflanke la disponeblon

116 *Aldono en la franca eldono:* „… kapitalon en sama grando por ilia estonta dungo en ia ajn alia branĉo de la industrio. Ni jam montris (vidu „Teorio de kompensado", ĉapitro 15, numero 6), ke tute ne estas tiel; ke neniu parto de la malnova kapitalo tiel fariĝas disponebla por la elĵetitaj laboristoj, sed ke ili mem, male, fariĝas disponeblaj por la novaj kapitaloj, se estas iuj." -vl

117 *En la originalo: „Les dés sont pipés*". -vl

de laboristoj per ties maldungo, dum samtempe la premo de la nedungitoj devigas la dungitojn liveri pli da laboro, do en certa grado sendependigas la proponon de laboro de la propono de laboristoj. Sur tiu ĉi bazo, la moviĝo de la leĝo de postulo kaj propono perfektigas la despotecon de la kapitalo.

Ekde kiam do la laboristoj malkovras la sekreton, kiel okazas, ke en la sama mezuro laŭ kiu ili laboras, produktas fremdan riĉaĵon kaj en kiu la produktadforto de ilia laboro kreskas, en la sama mezuro eĉ ilia funkcio kiel rimedo de plivalorigo de la kapitalo fariĝas ĉiam pli malcerta. Ekde kiam ili malkovras, ke la intensogrado de la konkurenco inter ili mem dependas tute de la premo de la relativa superloĝantaro; ekde kiam ili do provas organizi sisteman kunagadon inter la dungitoj kaj la nedungitoj, per sindikatoj, por rompi aŭ malfortigi la ruinigajn sekvojn de tiu naturleĝo de la kapitalisma produktado por sia klaso, la kapitalo kaj ĝia lakeo, la ekonomikisto, lamentas pri la rompo de la „eterna” kaj kvazaŭ „sankta” leĝo de postulo kaj propono. Ĉar ĉia kunagado de dungitoj kaj nedungitoj ĝenas la „puran” ludon de tiu leĝo. Ekde kiam, aliflanke, ekzemple en la kolonioj, malfavoraj cirkonstancoj malebligas la kreadon de industria rezervarmeo kaj per ĝi la absolutan dependecon de la laborista klaso en rilato al la kapitalista klaso, tiam la kapitalo ribelas, kune kun sia ekonomika advokato, kontraŭ la „sankta” leĝo de postulo kaj propono kaj ne hontas malhelpi ĝin perforte kaj per ŝtata interveno.

## 4. Diversaj ekzistoformoj de la relativa superloĝantaro. La ĝenerala leĝo de kapitalisma akumulado

La relativa superloĝantaro ekzistas en ĉiaj eblaj nuancoj. Ĉiu laboristo apartenas al ĝi dum la tempo en kiu li estas duone aŭ tute ne dungita. Sendepende de la grandaj, periode reaperantaj formoj, kiujn la fazoŝanĝo de la industria ciklo trudas al ĝi, tiel ke ĝi jen aperas akute en la krizoj, jen kronike en tempoj de malvigla komerco, ĝi posedas konstante tri formojn: fluan, latentan kaj stagnantan.

En la centroj de la moderna industrio – fabrikoj, manufakturoj, uzinoj kaj minejoj ktp – laboristoj estas jen fortenataj, jen en pli granda amplekso altirataj, tiel ke ĝenerale la nombro de la dungitoj kreskas, kvankam en ĉiam malkreskanta proporcio al la skalo de produktado. La superloĝantaro ekzistas tie en flua formo.

Same en la veraj fabrikoj kiel en ĉiuj grandaj laborejoj, kie la maŝino eniras kiel faktoro aŭ kie oni aranĝis nur la modernan labordividon, oni bezonas amase da viraj laboristoj nur ĝis la aĝo de matureco. Kiam ili atingas tiun aĝon, nur tre malmultaj da ili restas en la samaj branĉoj, dum la plimulto estas regule maldungata. Ili konsistigas elementon de la flua superloĝantaro, kiu kreskas kun la amplekso de la industrio. Parto da ili elmigras kaj fakte nur postvojaĝas la elmigrantan kapitalon. Unu el la sekvoj estas, ke la ina loĝantaro kreskas pli rapide ol la vira – pri tio atestas Anglio. Ke la natura kresko de la laborista amaso ne satigas la akumuladbezonojn de la kapitalo kaj tamen superas ilin, tio estas kontraŭdiro de ĝia moviĝo mem. Ĝi bezonas pli grandajn kvantojn da junaj laboristoj, malpli en plenkreska aĝo. Tiu kontraŭdiro ne estas pli akra ol la alia, ke oni plendas pri manko da brakoj en la sama momento kiam multaj estas senlaboraj, ĉar la labordivido katenas ilin al certa industribranĉo.[118] La konsumado de la laborforto fare de la kapitalo estas krome tiom rapida, ke la mezaĝa laboristo plej ofte estas jam pli aŭ malpli eluzita. Li falas en la vicojn de la supernombraj aŭ oni metas lin en pli malaltan kategorion. Ĝuste ĉe la laboristoj de la granda industrio ni renkontas la plej mallongan vivdaŭron.

„D-ro Lee, la oficisto pri sano de Manĉestro, konstatis ke en tiu urbo la meza

118 Dum en la lasta duonjaro de 1866 en Londono 80.000 ĝis 90.000 laboristoj estis maldungitaj, oni legas en la fabrikraporto pri tiu sama duonjaro: „Ŝajnas ne esti absolute ĝusta, se oni diras, ke postulo alportas proponon ĝuste en la momento kiam necesas. Pri laboro tio ne okazis, ĉar multaj maŝinoj estis lastan jaron haltigitaj pro manko je laborfortoj." („*Report of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1866*", p. 81)

> vivdaŭro de la bonstata klaso estas 38, tiu de la laborista klaso nur 17 jaroj. En Liverpulo ĝi estas 35 jaroj por la unua, 15 por la dua. Sekvas do, ke la privilegiita klaso havas asignon je vivo (*have a lease of life*) pli ol duoble grandan ol tiu de iliaj malpli favorataj kuncivitanoj."[119]

En tiuj cirkonstancoj la absoluta kresko de tiu frakcio de la proletaro devas do okazi en formo, kiu ŝveligas ilian nombron, kvankam iliaj elementoj eluziĝas rapide. Do rapida sinsekvo de la laboristaj generacioj. (La sama leĝo ne validas por la ceteraj klasoj de la loĝantaro.) La socia bezono estas kontentigata per fruaj geedziĝoj – necesa sekvo de la kondiĉoj, en kiuj la laboristoj de la granda industrio vivas – kaj per la premio, kiun la ekspluatado de la laboristaj infanoj metas sur ilia produktado.

Ekde kiam la kapitalisma produktado regas la kampkulturon – laŭ la grado en kiu ĝi regas ĝin –, kun la akumulado de la tie funkcianta kapitalo absolute malpliiĝas la postulo por la kampara loĝantaro, sen ke ĝia repuŝado estas kompensata, kiel en ne kampkulturaj industrioj, de pli granda altiro. Parto de la kampara loĝantaro troviĝas do konstante en la situacio transironta al urba aŭ manufaktura proletaro, kaj en la atendo de cirkonstancoj favoraj al tiu transformiĝo. (Manufakturo ĉi tie en la senco de ĉia ne kampkultura industrio)[120] Tiu fonto de relativa superloĝantaro fluas do konstante. Sed ĝia konstanta fluado al la urboj premisas en la kamparo mem konstantan latentan superloĝantaron, kies amplekso videblas nur kiam la deflukanaloj esceptokaze larĝe malfermiĝas. La kamplaboristo estas do premata al la minimumo de salajro kaj staras per unu piedo ĉiam en la marĉo de mizero[121].

La tria kategorio de la relativa superloĝantaro, la stagnanta, konsistigas

---

119 Parolado de malfermo de la sankonferenco, Birminghamo, la 14-an de januaro 1975, de J. Chamberlain, tiam urbestro de la urbo, nun (1883) ministro pri komerco.

120 „781 urboj" estas nombrataj en la popolnombrado de 1861 por Anglio kaj Kimrio „kun 10.960.998 loĝantoj, dum la vilaĝoj kaj paroĥoj nombras nur 9.105.226 … En la jaro 1851 troviĝis 580 urboj en la nombrado, kies loĝantaro estis proksimume egala al tiu de la ilin ĉirkaŭantaj kamparaj distriktoj. Sed dum en la lastaj la loĝantaro kreskis dum la sekvaj dek jaroj nur je duona miliono, ĝi kreskis en la 580 urboj je 1.554.067. La alkresko en la kamparaj paroĥoj estas 6,5 elcentoj, en la urboj 17,3 elcentoj. La diferenco en la kreskokvoto estas ŝuldata al la migrado urbon. Tri kvaronoj de la ĉioma kresko de la loĝantaro apartenas al la urboj." („*Census* ktp", VIII, p. 11, 12)

121 *Originale*: „*Pauperismus*", paŭpereco. -vl

parton de la aktiva laborist-armeo, sed kun tute malregula dungeco. Ĝi tiel donas do al la kapitalo neelĉerpeblan rezervon de disponebla laborforto. Ĝia vivsituacio malaltiĝas sub la mezuman normalon de la laborista klaso, kaj ĝuste tio faras ĝin larĝa bazo de apartaj ekspluatbranĉoj de la kapitalo. Maksimuma labortempo kaj minimuma salajro karakterizas ĝin. En la rubriko de domlaboro ni jam ekkonis ĝian precipan figuron. Ĝi rekrutiĝas konstante el la supernombruloj[122] de la granda industrio kaj kampkulturo kaj speciale ankaŭ el pereantaj industribranĉoj, kie la metiejo subiĝas al la manufaktura sistemo, kaj tiu al la maŝinsistemo. Ĝia amplekso etendiĝas kun la mezuro, laŭ kiu kun amplekso kaj energio de la akumulado progresas la „supernombrigo". Sed ĝi konsistigas samtempe sin mem reproduktantan kaj eternigantan elementon de la laborista klaso, kiu kreskas en pli alta proporcio al la tuta kresko de la klaso ol la aliaj elementoj. Efektive ne nur la kvanto de naskoj kaj mortoj, sed ankaŭ la absoluta grando de la familioj estas en inversa proporcio al la alteco de la salajro, do al la kvanto de vivrimedoj pri kiuj la diversaj laboristaj kategorioj disponas. Tiu leĝo de la kapitalisma socio ne troviĝas ĉe la sovaĝuloj aŭ eĉ inter civilizitaj koloniuloj. Ĝi memorigas la amasan reproduktadon de individue malfortaj kaj multe ĉasataj bestaj specioj.[123]

La plej malalta tavolo de la relativa superloĝantaro estas fine la sfero de paŭpereco. Krom la vagabondoj, krimuloj, prostituitoj, mallonge la propradira ĉifonproletaro[124], tiu socia tavolo konsistas el tri kategorioj. Unue, el homoj kapablaj labori. Oni bezonas nur supraĵe rigardi la statistikon de la angla paŭpereco por vidi, ke ĝia amaso ŝvelas kun ĉiu krizo kaj malŝvelas kun ĉiu revigliĝo de la komerco. Due: orfoj kaj idoj de paŭperuloj. Ili estas kandidatoj de la industria rezervarmeo, kaj en tempoj de granda prospero, ekz-e en 1860, estas rapide kaj amase enigitaj en la aktivan laborist-armeon. Trie: mizeruloj, demoralizitoj, homoj

---

122 *Originale*: „*Überzähligen*", supernombruloj, trouloj. -vl

123 „Malriĉeco ŝajnas favori la generadon." (A. Smith) Tio ŝajnas esti eĉ aparte saĝa aranĝo de Dio laŭ la galanta kaj sprita abato Galiani: „Dio faris tiel, ke la homoj kiuj praktikas la plej utilajn metiojn naskiĝas superabunde." (Galiani, l.c., p. 78) „Mizero, ĝis la plej ekstrema grado de malsatego kaj pesto, tendencas pliigi la kreskon de la loĝantaro anstataŭ malhelpi ĝin." (S. Laing, *National Distress*", 1844, p. 69) Post ilustri tion statistike, Laing daŭrigas: „Se ĉiuj troviĝus en komfortaj cirkonstancoj, la mondo estus baldaŭ sen loĝantoj." („*If the people were all in easy circumstances, the world would soon be depopulated"*.)

124 *Originale: „Lumpenproletariat*. Mi transprenas la Esperantan ekvivalenton el la *Manifesto de la Komunista Partio,* tradukita de Detlev Blanke. -vl

nekapablaj labori. Temas pri individuoj, kiuj pereas pro sia senmoveco kaŭzita de la labordivido, tiaj, kiuj vivas trans la normala vivdaŭro de laboristo, fine la viktimoj de la industrio, kies nombro kreskas kun danĝeraj maŝinoj, minejaj konstruaĵoj, ĥemiaj fabrikoj ktp, kripluloj, kronikaj malsanuloj, vidvinoj ktp. La paŭpereco estas la invalidejo de la aktiva laborista armeo kaj la morta pezo de la industria rezervarmeo. Ĝia produktiĝo estas inkludita en la produktiĝo de la relativa superloĝantaro, ĝia neceso en ties neceso, kun tiu ĝi estas ekzistpremiso de la kapitalisma produktado kaj disvolvado de la riĉaĵo. Ĝi apartenas al la kromelspezoj[125] de la kapitalisma produktado, kiujn la kapitalo tamen scias grandparte deŝovi de si mem sur la ŝultrojn de la laborista klaso kaj de la malgranda meza klaso.

Ju pli grandas la socia riĉaĵo, la funkcianta kapitalo, amplekso kaj energio de ĝia kresko, do ankaŭ la absoluta grando de la proletaro kaj la produktadforto de ĝia laboro, des pli grandas la industria rezervarmeo. La disponebla laborforto estas disvolvata de la samaj kaŭzoj kiel la ekspansiforto de la kapitalo. La relativa grando de la industria rezervarmeo kreskas do kun la potencoj de la riĉaĵo. Sed ju pli grandas tiu rezervarmeo proporcie al la aktiva laborist-armeo, des pli amasa estas la solidiĝinta superloĝantaro, kies mizero estas en inversa proporcio al sia laborturmento. Fine, ju pli grandas la mizeraj tavoloj de la laborista klaso kaj la industria rezervarmeo, des pli grandas la oficiala paŭpereco. *Tiu estas la absoluta, ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado*. Ĝi estas, same kiel ĉiuj aliaj leĝoj, en sia efiko modifata de multaj cirkonstancoj, kies analizo ne havas lokon ĉi tie.

Oni komprenas la stultecon de la ekonomikista saĝo, kiu predikas al la laboristoj adapti sian nombron al la plivalorigbezonoj de la kapitalo. La meĥanismo de la kapitalisma produktado kaj akumulado konstante adaptas tiun nombron al tiuj plivalorigbezonoj. La unua vorto de tiu adaptado estas la kreado de relativa superloĝantaro aŭ industria rezervarmeo, lasta vorto la mizero de ĉiam kreskantaj tavoloj de la aktiva laborist-armeo kaj la morta pezo de la paŭpereco.

La leĝo, laŭ kiu ĉiam kreskanta kvanto de produktadrimedoj, danke al la progreso de la produktivo de la socia laboro, moveblas per ĉiam pli malgranda elspezo de homa forto, estas leĝo, kiu sur kapitalisma bazo – kie ne la laboristo aplikas la laborrimedojn, sed la laborrimedoj aplikas la laboriston – esprimiĝas per tio, ke, ju pli altas la laborproduktivo, des pli

125 *Originale: „faux frais*” -vl.

grandas la premo de la laboristoj sur siaj dungrimedoj[126], des pli malcerta do ilia ekzistadkondiĉo: vendo de la propra forto por pliigi la fremdan riĉaĵon aŭ por memvalorigo de la kapitalo. Pli rapida kresko de la produktadrimedoj kaj de la laborproduktivo ol tiu de la produktiva loĝantaro esprimiĝas kapitalisme do inverse en tio, ke la laborista loĝantaro kreskas ĉiam pli rapide ol la plivalorigbezono de la kapitalo.

Ni vidis en la kvara sekcio ĉe la analizo de la relativa plusvaloro: ene de la kapitalisma sistemo ĉiuj metodoj por pliigi la socian laborproduktivon funkcias surkoste de la individua laboristo; ĉiuj rimedoj por disvolvi la produktadon turniĝas en rimedojn por domini kaj ekspluati la produktanton, kripligas la laboriston en parthomon, malnobligas lin al aldonaĵo de la maŝino, neniigas per la turmento de lia laboro ties enhavon, fremdigas al li la spiritajn potencojn de la laborprocezo en la sama mezuro en kiu la scienco estas al ĝi enkorpigata kiel sendependa potenco; ili aĉigas la kondiĉojn en kiuj li laboras, submetas lin dum la laborprocezo al plej etanima malica despoteco, transformas lian vivtempon en labortempon, ĵetas lian edzinon kaj infanon sub la radegon de la kapitalo. Sed ĉiuj metodoj por produkti la plusvaloron estas samtempe metodoj de akumulado, kaj ĉia etendo de la akumulado fariĝas inverse rimedo por disvolvi tiujn metodojn. Sekvas do, ke en la mezuro laŭ kiu kapitalo akumuliĝas, la situacio de la laboristo, kia ajn estas lia pago, alta aŭ malalta, devas malboniĝi. La leĝo fine, kiu tenas en ekvilibro la relativan superloĝantaron aŭ industrian rezervarmeon ĉiam kun la amplekso kaj la energio de la akumulado, forĝas la laboriston pli firme al la kapitalo ol la kejloj de Hefajsto Prometeon al la roko. Ĝi premisas akumuladon de mizero kongruan kun la akumulado de kapitalo. La akumulado de riĉaĵo sur unu poluso estas do samtempe akumulado de mizero, de labortorturo, de sklaveco, de nesciado, de brutaligo kaj de morala degradado sur ĝia kontraŭa poluso, t.e. flanke de la klaso, kiu produktas sian propran produkton kiel kapitalon.

Tiu antagonisma karaktero de la kapitalisma akumulado[127] estas eldirita

126 *Originale*: „*Beschäftigungasmittel*”, laŭvorte: okupadrimedoj. -vl

127 „… ĉiutage fariĝas pli klara, ke la produktadkondiĉoj, en kiuj la burĝaro moviĝas, havas ne unuecan, simplan karakteron, sed ambiguan; ke en la samaj kondiĉoj, en kiuj produktiĝas riĉaĵo, produktiĝas ankaŭ la mizero; ke en la samaj kondiĉoj, en kiuj la disvolviĝo de la produktadfortoj okazas, disvolviĝas subpremforto; ke tiuj kondiĉoj produktas la *burĝan riĉaĵon*, t.e. la riĉaĵon de la burĝa klaso, nur sub konstanta neniigo de la riĉaĵo de unuopaj membroj de

en diversaj formoj de ekonomikistoj, kvankam ili kunmiksas parte ja analogajn, sed tamen esence malsamajn fenomenojn de antaŭkapitalismaj produktadmanieroj.

La venecia monaĥo Ortes, unu el la grandaj ekonomikaj verkistoj de la 18-a jarcento, komprenas la antagonismon de la kapitalisma produktado kiel ĝeneralan naturleĝon de la socia riĉaĵo.

> „La ekonomia bono kaj ekonomia malbono tenas sin en iu nacio ĉiam en ekvilibro (*il bene ed il male economico in una nazione sempre all'istessa misura*), la abundo de havaĵoj por iuj estas ĉiam egala al la malabundo de la samaj havaĵoj por aliaj (*la copia dei beni in alcuni sempre eguale alla mancanza di essi in altri*). Granda riĉaĵo de iuj estas ĉiam akompanata de absoluta senigo de la necesaĵo ĉe multe pli aliaj. La riĉaĵo de nacio kongruas kun ĝia loĝantaro, kaj ĝia mizero kongruas kun ĝia riĉaĵo. La laboremo en iuj devigas la nelaboradon en aliaj. La malriĉuloj kaj nelaborantoj estas necesa frukto de la riĉuloj kaj aktivuloj" ktp.[128]

En tute kruda maniero, proksimume dek jarojn post Ortes, la altranga protestanta pastro Townsend gloris la malriĉecon kiel necesan kondiĉon de la riĉeco.

> „Leĝa devigo labori estas ligita kun tro da peno, perforto kaj bruo, dum la malsato kaŭzas ne nur pacan, silentan, senĉesan premon, sed kiel plej natura motivo al industrio kaj al laboro la plej potencan klopodon."

Do, necesas igi la malsaton inter la laborista klaso konstanta, kaj por tio zorgas, laŭ Townsend, la principo de populacio, kiu aparte aktivas inter la malriĉuloj.

> „Ŝajnas esti naturleĝo, ke la malriĉuloj estas certagrade facilanimaj (*improvident*)" (nome tiom facilanimaj enmondiĝi sen oraj kuleroj en la buŝo), „tiel ke ĉiam ekzistas iuj (*that there always may be some*) por plenumi la plej servaĉajn, plej malpurajn kaj plej fiajn funkciojn de la komunumo. La fonduso de homa feliĉo (*the fund of human happiness*) estas per tio tre grandigita, la pli delikataj homoj (*the more delicate*) estas liberigitaj el la laboraĉo kaj povas neĝenate dediĉi sin al pli alta alvokiteco ktp … La malriĉulleĝo tendencas detrui la harmonion kaj la belecon, la simetrion kaj ordon de tiu sistemo, kiun

---

tiu klaso kaj sub kreado de ĉiam kreskanta proletaro." (Karlo Markso: La mizero de la filozofio …, v.c., p. 136)

128 G. Ortes, „*Della Economia Nazionale libri sei 1774", ĉe Custodi, Parte Moderna*, vol. XXI, p. 6, 9, 22, 25 ktp. Ortes diras, l.c., p. 32: „Anstataŭ starigi sistemojn senutilajn por la feliĉo de la popoloj, mi limigu min esplori la kaŭzojn de ilia malfeliĉo."

Dio kaj la naturo starigis."[129]

Dum la venecia monaĥo trovis en la sorto, kiu eternigas la mizeron, la ekzistpravigon de la kristana karitato, la protestanta profitulo trovas en ĝi, male, la pretekston kondamni la leĝojn, pro kiuj la malriĉuloj posedis rajton je magra publika subteno.

> „La progreso de la socia riĉaĵo", diras Storch, „produktas tiun utilan klason de la socio … kiu praktikas la plej enuigajn, plej ordinarajn kaj plej naŭzajn laborojn, unuvorte prenas sur siajn ŝultrojn ĉion, kion la vivo havas da malagrabla kaj servutiga, kaj ĝuste per tio havigas al la aliaj klasoj la tempon, la serenecon de la spirito kaj la konvencian" (tiel!) „dignon de karaktero …"[130]

Storch demandas sin, kiu estas la avantaĝo de tiu kapitalisma civilizacio, kun ĝia mizero kaj ĝia degradado de la amasoj, antaŭ la barbareco? Li trovas nur unu respondon – la sekurecon!

> „Per la progreso de la industrio kaj de la scienco", diras Sismondi, „ĉiu laboristo povas ĉiutage produkti pli ol li bezonas por sia konsumado. Sed tiu riĉaĵo, produkto de lia laboro, farus lin ne tre laborema, se li povus konsumi ĝin." Laŭ li, „la homoj" (t.e. la nelaborantoj) „verŝajne rezignus pri ĉiaj perfektaĵoj de la artoj kiel pri ĉiaj ĝuoj kiujn la industrio disponigas al ni, se ili devus aĉeti ilin per konstanta laboro, kiel tiu de la laboristo … La klopodoj estas hodiaŭ disigitaj disde ilia rekomenco; ne estas la sama homo kiu unue laboras kaj poste ripozas: male, ĝuste ĉar la unua laboras, la alia devas ripozi … La senfina multigo de la produktadfortoj de la laboro povas do havi nenian alian rezulton ol la pliiĝon de la lukso kaj de la ĝuoj de la nelaborantaj riĉuloj."[131]

Destutt de Tracy, fine, la fiŝsanga burĝa doktrinulo, elparolas tion brutale:

---

129 „*A Dissertation on the Poor Laws. By a Wellwisher of Mankind (The Rev. Mr. J. Townsend*), 1786", reeldonita Londono, 1817, p. 15, 39, 41. Tiu „delikata" pastro, kies ĵus cititan verkon, apud lian vojaĝon tra Hispanio, Malthus ofte kopias per tutaj paĝoj, pruntis sian doktrinon el Sir J. Steuart, kiun li tamen distordas. Ekz-e kiam Steuart diras: „Tie, en la sklaveco, ekzistis perforta metodo fari la homaron laborema" (por la nelaborantoj) „… La homoj estis tiam devigataj al la laboro," (t.e. al la senpaga laboro por aliuloj) „ĉar ili estis sklavoj de aliuloj; la homoj estas nun devigataj al la laboro," (t.e. al senpaga laboro por nelaborantoj) „ĉar ili estas la sklavoj de siaj propraj bezonoj", li tamen ne konkludas, kiel la grasa profitulo, ke la dunglaboristoj ĉiam malsatu. Li volas male pliigi iliajn bezonojn kaj fari la kreskantan nombron de iliaj bezonoj samtempe sprono de ilia laboro por „la delikatuloj".

130 Storch, l.c., vol. III, p. 223.

131 Sismondi, l.c., vol. I, p. 79, 80, 85.

„La malriĉaj nacioj estas tiuj, kie la popolo fartas bone, kaj la riĉaj nacioj estas tiuj, kie ĝi kutime estas malriĉa."[132]

132 Destutt de Tracy, l.c., p. 231. „*Les nations pauvres, c'est là où le peuple est à son aise; et les nations riches, c'est là où il est ordinairement pauvre.*"

# *DUDEKTRIA ĈAPITRO. PARTO II (SEKCIO 5 a ĝis c)*

## *La ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado*

## 5. Ilustrado de la ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado

### *a) Anglio de 1846 ĝis 1866*

Neniu periodo de la moderna socio estas tiom favora por la studado de la kapitalisma akumulado ol la periodo de la laste pasintaj dudek jaroj[133]. Estas kvazaŭ ili trovintus la magian sakon de Fortunato. Ree Anglio donas inter ĉiuj landoj la klasikan ekzemplon, ĉar ĝi konservas la unuan rangon en la mondmerkato, la kapitalisma produktadmaniero estas tie komplete disvolvita, kaj fine la enkonduko de la Miljara Regno de la liberkomerco ekde 1846 fortranĉis al la vulgara ekonomiko la lastan rifuĝejon. La titaneca progreso de produktado, tiel ke la lasta duono de la dudeka periodo jam multe superas la unuan, estis jam sufiĉe menciita en la kvara sekcio.

Kvankam la absoluta kresko de la angla loĝantaro en la lasta duonjarcento estis tre granda, la proporcia kresko aŭ la kvoto de la kresko konstante falis, kiel la sekva tabelo montras, kiu estas prenita el la oficiala popolnombrado:

*Jara elcenta kresko de la loĝantaro de Anglio kaj Kimrio en dekumaj nombroj*

| | |
|---|---|
| 1811-1821 | 1,533 % |
| 1821-1831 | 1,446 % |
| 1831-1841 | 1,326 % |
| 1841-1851 | 1,216 % |
| 1851-1861 | 1,141 % |

Ni rigardu nun aliflanke la kreskon de la riĉaĵo. Por tio, la plej fidinda

133 Tio estis skribita en marto 1867. -fr

indiko estas la evoluo de la profitoj, grundrentoj ktp, kiuj estas submetitaj al enspezimposto. La kresko de la impostataj profitoj (ne inkluditaj estas farmistoj kaj kelkaj aliaj kategorioj) estis por Britio de 1853 ĝis 1864 50,47 elcentoj (aŭ 4,58 elcentoj en jara mezumo),[134] tiu de la loĝantaro dum la sama periodo proksimume 12 elcentoj. La kresko de la impostendaj rentoj estis de 1853 ĝis 1864 38 elcentoj aŭ $3^5/_{12}$ elcentoj jare, en kiu pleje partoprenis la sekvaj kategorioj:[135]

| | Kromaĵo de la jara enspezo de 1864 super tiu de 1853 | Jara kresko |
|---|---|---|
| de domoj: | 38,60 % | 3,50 % |
| ŝtonrompejoj: | 84,76 % | 7,70 % |
| minejoj: | 68,85 % | 6,25 % |
| feruzinoj: | 39,92 % | 3,63 % |
| fiŝentreprenoj: | 57,37 % | 5,21 % |
| gasfabrikoj: | 126,02 % | 11, 45 % |
| fervojoj: | 83,29 % | 7,57 % |

Se oni komparas po kvar jarojn de la periodo de 1853-1864, la kresko-grado de la enspezoj kreskas konstante. Ĝi estas ekz-e por la enspezoj devenaj el profito de 1853-1857 jare 1,73 %, 1857-1861 jare 2,74 %, kaj 9,30 %jare por 1861-1864. La tuta sumo de la enspezoj submetitaj al enspezimposto de la Unuiĝinta Reĝlando estis 1856: 307.068.898 sterlingaj pundoj, 1859: 38.127.416 pundoj, 1862: 351.745.241 pundoj, 1863: 359.142.897 pundoj, 1864: 362.462.279 pundoj, 1865: 385.530.020 pundoj.[136]

134 „*Tenth Report of the Commissioners of H. M's Inland Revenue*", Londono, 1866, p. 38.

135 Saml.

136 Tiuj nombroj sufiĉas por kompari, sed, se rigardataj absolute, ili estas malĝustaj, ĉar eble 100 milionoj da pundoj de enspezo jare ne estas deklaritaj. La komisaroj de la Enlanda Enspezo (*Commissioners of Inland Revenue*) plendas ade en ĉiu el siaj raportoj pri sistema trompo, speciale de komerca kaj industria flanko. Ekzemple: „Iu akcikompanio indikis siajn imposteblajn profitojn

La akumulado de la kapitalo estis samtempe akompanata de ĝia koncentriĝo kaj centralizo. Kvankam ne ekzistis oficiala statistiko pri la angla kampkulturo (sed ja por Irlando), ĝi estis libervole liverita de dek distriktoj. El ili rezultas, ke de 1851 ĝis 1861 la farmbienoj sub 100 akreoj malpliiĝis de 31.583 al 26.567, ke do 5.016 estis kunigitaj kun pli grandaj farmbienoj.[137] De 1815 ĝis 1825 por nenia persona movebla havaĵo de pli ol unu miliono da sterlingaj pundoj estis pagita heredimposto, sed de 1825 ĝis 1855 8, de 1855 ĝis junio 1859, do en kvar jaroj kaj duono, 4.[138] Sed la progreson de la centralizo oni plej bone vidas el mallonga analizo de la enspezimposto por la kategorio D (profitoj kun ekskludo de farmistoj ktp) en la jaroj 1864 kaj 1865. Mi rimarkigu antaŭe, ke enspezoj el tiu fonto de 60 pundoj kaj pli pagas enspezomposton. Tiuj impostdevigaj enspezoj estis en Anglio, Kimrio kaj Skotlando en 1864: 95.844.222 sterlingaj pundoj, kaj en 1865: 105.435.787 pundoj,[139] la nombro de impostitaj personoj estis en 1864: 308.416 el totala loĝantaro de 23.891.009, en 1865: 332.431 el totala loĝantaro de 24.127.003. Pri la disdivido de tiuj enspezoj en la du jaroj informas jena tabelo:

| | **Jaro finiĝanta la 5-an de aprilo 1864** | | **Jaro finiĝanta la 5-an de aprilo 1865** | |
|---|---|---|---|---|
| | **Enspezo (st. pundoj) el profitoj** | **individuoj** | **Enspezo (st. pundoj el profitoj** | **individuoj** |
| totala enspezo: | 95.844.222 | 308.416 | 105.435.738 | 332.431 |
| el ili: | 57.028.290 | 22.334 | 64.554.297 | 24.075 |
| el ili: | 36.415.225 | 3.619 | 42.535.576 | 4.021 |
| el ili: | 22.809.781 | 822 | 27.555.313 | 973 |
| el ili: | 8.744.762 | 91 | 11.077.238 | 107 |

En la Unuiĝinta Reĝlando estis en 1855 produktitaj: 61.453.079 tunoj

je 6.000 sterlingaj pundoj [tiel laŭ la franca kaj la angla eldonoj; laŭ la germana: 60.000 pundoj. -vl], la taksisto levis ĝin al 88.000, kaj laŭ tiu sumo la imposto estis fine pagita. Alia kompanio indikis 190.000 pundojn, ĝi devis konfesi ke la reala sumo estis 250.000 pundoj (saml., p. 42)

137 „*Census* ktp”, l.c., p. 29. La aserto de John Bright, ke 150 grundsinjoroj estas proprietuloj de la duono de la angla grundo, kaj 12 de la duono de la skota grundo, ne estas refutita.

138 „*Fourth Report ktp of Inland Revenue*”, Londono, 1860, p. 17.

139 Tiuj estas la netaj enspezoj, do post certaj leĝe validaj reduktoj.

da karbo en valoro de 16.113.267 sterlingaj pundoj, en 1864: 92.787.873 tunoj en valoro de 23.197.968 pundoj, en 1855: 3.218.154 tunoj da kruda fero en valoro de 8.045.385 pundoj; en 1864: 4.767.951 tunoj en valoro de 11.919.877 pundoj; en 1854 la longeco de funkciantaj fervojoj en la Unuiĝinta Reĝlando estis 8.054 mejloj, kun enpagita kapitalo de 286.068.794 pundoj. En la jaro 1854 la ĉioma eksporto kaj importo de la Unuiĝinta Reĝlando estis 268.210.145 pundoj, en 1865: 489.93.285 pundoj. La sekva tabelo montras la evoluon de la eksporto (en sterlingaj pundoj):

| | |
|---|---|
| 1847: | 58.842.377 |
| 1849: | 63.596.052 |
| 1856: | 115.826.948 |
| 1860: | 135.842.817 |
| 1865: | 165.862.402 |
| 1866: | 188.917.563[140] |

Post tiuj malmultaj indikoj oni komprenas la triumfkrion de la ĝenerala registristo de la brita popolo:

> „Kvankam ĝi kreskis rapide, la loĝantaro ne progresis sampaŝe kun la progreso de la industrio kaj de la riĉeco.”[141]

Ni turnu nin nun al la rektaj agantoj de tiu industrio aŭ la produktantoj de tiu riĉaĵo, al la laborista klaso.

> „Estas unu el la plej melankoliaj trajtoj en la socia stato de la lando”, diras Gladstone, „ke kun la malpliiĝo de la konsumpovo de la popolo kaj pliiĝo de la malhavoj kaj de la mizero de la laborantaj klasoj okazas samtempe konstanta akumulado de riĉaĵo en la pli altaj klasoj kaj konstanta kresko de kapitalo.”[142]

---

140 En tiu ĉi momento, marto 1867, la merkato de Hindio kaj de Ĉinio estis denove plenŝtopita de britaj kotonvaroj, pro la konsignoj voĉdonitaj por ili. En 1866 komencis inter la kotonlaboristoj 5-elcenta malaltigo de la salajro, en 1867, sekve al simila operacio, striko de 20.000 homoj en *Preston*.{Tiu estis la antaŭludo de la krizo, kiu tuj poste eksplodis. - F. E.}

141 „*Census* ktp”, l.c., p. 11.

142 Gladstone en la ĉambro de deputitoj, la 13-an de februaro 1843: „It is one of the most melancholy features in the social state of this country that we see, beyond the possibility of denial, thet while there is at this moment a decrease in the consuming powers of the people, an increase of the pressure of privati-

Tiel parolis tiu pastre solena ministro en la parlamento la 13-an de februaro 1843. La 16-an de aprilo 1863, dudek jarojn poste, en la parolado, en kiu li prezentas sian buĝeton:

> „De 1842 ĝis 1852 la impostebla enspezo de tiu ĉi lando kreskis je 6 elcentoj … En la ok jaroj de 1853 ĝis 1861 ĝi kreskis, se ni ekiras de la bazo de 1853, je 20 elcentoj. La fakto estas tiom miriga, ke ĝi estas preskaŭ nekredebla … Tiu ebriiga pliiĝo de riĉeco kaj de potenco … estas komplete limigita al la posedantaj klasoj, sed … sed, ĝi devas havi malrektan avantaĝon por la laborista loĝantaro, ĉar ĝi malplikostigas la artiklojn de la ĝenerala konsumado – dum la riĉuloj fariĝis pli riĉaj, la malriĉuloj ĉiukaze fariĝis malpli malriĉaj. Mi ne kuraĝas diri, ke la ekstremoj de malriĉeso malpliiĝis <4-a eldono: ŝanĝiĝis>."[143]

Kia lama malklimakso! Se la laborista klaso restis „malriĉa", nur „malpli malriĉa", en la proporcio, en kiu ĝi produktis „ebriigan pliiĝon de riĉeco kaj de potenco" por la klaso de la proprieto, tiam ĝi restis relative same malriĉa. Se la ekstremoj de la malriĉeco ne malpliiĝis, ili pliiĝis, ĉar la ekstremoj de la riĉeco pliiĝis. Koncerne la malplikostigon de la vivrimedoj, la oficiala statistiko, ekz-e la indikoj de la Londona Orfejo, montras plikostiĝon de 20 elcentoj por la mezumo de la tri jaroj de 1960 ĝis 1862, kompare kun 1851 ĝis 1863. En la sekvaj tri jaroj 1863-1865 ĝi montras progresantan plikostiĝon de viando, butero, lakto, sukero, salo, karboj kaj amaso da aliaj necesaj vivrimedoj.[144] La sekva buĝet-parolado de Gladstone, de la 7-a de aprilo 1864, estas pindara ditirambo pri la pro-

---

ons and distress; there is at the same time a constant accumulation of wealth in the upper classes, an increase in the luxuriousness of their habits, and of their means of enjoyment." („*Times*", 14-a de februaro 1843. – Hansard, 13-a de februaro)

143 „From 184 to 1852 the taxable income of the country increased by 6 per cent … In the 8 years from 1853 to 1861, it had increased from the basis taken in 1853, 20 per cent! The fact ist so astonishing as to be almost incredible … this intoxicating augmentation of wealth and power … entirely confined to classes of property … must be of indirect benefit to the labouring population, because it cheapens the commodities of gneral consumption – while the rich have been growing richer, the poor have been growing less poor! at any rate, whether the extremes of poverty are less, I do not presume to say." (Gladstone en la Ĉambro de la Deputitoj, 16-a de aprilo 1863. „*Morning Star*", 17-a de aprilo)

144 Vidu la oficialajn indikojn en la blulibro: „*Miscellaneous Statistics of the United Kingdom. Part VI*", Londono, 1866, p. 260-273 divl. Anstataŭ la statistiko de la orfejoj ktp povus servi ankaŭ la deklamaĵoj de ministrejaj gazetoj por rekomendi dotojn por la reĝidoj. La plikosteco de la vivrimedoj estas tie neniam forgesita.

greso de la plusfarado kaj pri la feliĉo de la popolo mildigita per „malriĉeco”. Li parolas pri amasoj „ĉe la rando de paŭpereco”, pri la komercaj branĉoj, „en kiuj la salajro ne kreskis”, kaj fine resumas la feliĉon de la laborista klaso per la vortoj:

> „La homa vivo estas en naŭ kazoj el dek nura batalo por la ekzistado.”[145]

Profesoro Fawcett, ne kiel Gladstone ligita per oficialaj konsideroj, deklaras senorname:

> „Kompreneble mi ne neas, ke la monsalajro kreskis kun tiu pliiĝo de la kapitalo,” (en la lastaj jardekoj) „sed tiu ŝajna avantaĝo grandparte perdiĝas, ĉar multaj vivbezonoj fariĝas konstante pli multekostaj” (li kredas, ke pro valorperdo de la noblaj metaloj) „… La riĉuloj fariĝas rapide pli riĉaj (*the rich grow rapidly richer*), dum percepteblas nenia kresko de la komforto de la laborantaj klasoj … La laboristoj fariĝas preskaŭ sklavoj de la komercistoj, kies ŝuldantoj ili estas.”[146]

En la sekcioj pri la labortago kaj la maŝinaro senvualiĝis la cirkonstancoj, sub kiuj la brita laborista klaso kreis „ebriigan pliiĝon de riĉeco kaj de potenco” por la posedantaj klasoj. Tamen tiam ni okupiĝis ĉefe pri la laboristo dum lia socia funkciado. Por plene prilumi la leĝojn de la akumulado necesas konsideri ankaŭ lian situacion ekster la laborejo, lian situacion de nutriĝo kaj de loĝado. La limo de tiu ĉi libro postulas ke ni konsideru ĉi tie ĉefe la plej malbone pagatan parton de la industria proletaro kaj de la kampkulturaj laboristoj, do la plimulton de la laborista klaso.

Tamen antaŭe ankoraŭ vorton pri la oficiala paŭpereco aŭ la parto de la laborista klaso, kiu perdis sian ekzistskondiĉon, vendon de la laborforto,

---

145 „Think of those who are on the border of that region” (paŭpereco), „wages … in others not increased … human life is but, in nine cases out of ten, a struggle for existence.” (Gladstone, Ĉambro de Deputitoj, 7-a de aprilo, 1864) La versio ĉe Hansard tekstas: „Again; and yet more at large, what is human life but, in the majority of cases, a struggle for existence.” – La konstantajn akrajn kontraŭdirojn en la buĝetparoladoj de Gladstone de 1863 kaj 1864 angla verkisto karakterizas per la sekva citaĵo el Boileau <1-a ĝis 4-a eldono: Moliero>:

„Tia estas la homo; li saltas de unu celo al alia. Kion li laŭdis vespere, li kondamnis matene. Ĝena al aliaj homoj, li apenaŭ kapablas elteni siajn proprajn mankojn; li ŝanĝas siajn vestaĵojn, li ŝanĝas sian juĝon.” ([citita ĉe H. Roy,] „*The Theory of Exchanges* ktp”, Londono, 1864, p. 135)

146 H. Fawcett, l.c., p. 67, 82. La kreskanta dependeco de la laboristoj koncerne ilian komerciston estas la sekvo de la pliiĝantaj ŝanceliĝoj kaj interrompoj de ilia dungo.

kaj kiu vegetas per publikaj almozoj. La oficiala listo de paŭperuloj nombris en Anglio[147] en 1855: 851.369 personojn, en 1856: 877.767, en 1865: 971.433. Sekve al la kotonmanko ĝi ŝvelis en la jaroj 1863 kaj 1864 al 1.079.382 kaj 1.014.978. La krizo de 1866, kiu pleje trafis Londonon, kreis en tiu sidejo de la mondmerkato, pli riĉa je loĝantoj ol la reĝlando Skotlando, por 1866 kreskon de paŭperuloj de 19,5 elcentoj, kompare kun 1865, kaj de 24,4 elcentoj kompare kun 1864, kaj eĉ pli grandan kreskon por la unuaj monatoj de 1867 kompare kun 1866. Ĉe la analizado de la paŭperec-statistiko necesas emfazi du punktojn. Unuflanke la evoluo de la kresko kaj malkresko de la amaso de paŭperuloj respegulas la periodajn sortoŝanĝojn de la industria ciklo. Aliflanke la oficiala statistiko trompas pli kaj pli pri la reala amplekso de la paŭpereco en la mezuro laŭ kiu kun la akumulado de la kapitalo evoluas la klasbatalo kaj pro tio la memcert-eco[148] de la laboristoj. Ekz-e la barbara traktado de la malriĉuloj, pri kiu la angla gazetaro („*Times*”, „*Pall Mall Gazette*” ktp) dum la lastaj du jaroj tiom laŭte kriis, estas de malnova dato. F. Engelso konstatis en 1844 la tute samajn kruelaĵojn kaj la tute saman preterpasan, hipokritan lament-adon apartenantan al la „sensacia literaturo”. Sed la terura pliiĝo de la malsatmorto („*deaths by starvation*”) en Londono, dum la lasta jardeko, nepre pruvas la kreskantan abomenon de la laboristoj kontraŭ la sklaveco de la azilo[149], tiu punejo de la mizero.

## *b) La malbone pagataj tavoloj de la brita industria laborista klaso*

Ni rigardu nun la malbone pagatajn tavolojn de la industria laborista klaso. Dum la kotonkrizo de 1862, D-ro Smith de la *Privy Council* estis taskita enketi pri la nutriĝostato de la kotonlaboristoj troviĝantaj en mizera situacio en Lankaŝiro kaj Ĉeŝiro. Antaŭaj longjaraj observadoj kondukis lin al la konkludo, ke, „por eviti malsatmalsanojn (*starvation diseases*)”, la ĉiutaga nutraĵo de mezuma virino devas enteni almenaŭ 3.900 granojn da karbono kun 180 granoj da azoto, la ĉiutaga nutraĵo de

147 En Anglio estas Kimrio ĉiam entenata, en Grandbritio Anglio, Kimrio kaj Skotlando, en la Unuiĝinta Reĝlando tiuj tri landoj kaj Irlando. – En la Esperanta versio aperas ĝenerale *Britio* anstataŭ *Grandbritio*. -vl

148 En la angla versio: „*class-consciousness*” – klaskonscio. -vl

149 La fakto, ke por A. Smith la vorto *workouse* estas okaze ankoraŭ samsignifa kun *manufactory*, ĵetas apartan lumon sur la progreso de tiam farita. Ekz-e komence de lia ĉapitro pri labordivido: „Tiuj, kiuj estas okupataj en la diversaj branĉoj de laboro, povas esti kunigitaj en la sama azilo.”

mezuma viro almenaŭ 4.300 granojn da karbono kun 200 granoj da azoto, por la virinoj proksimume la kvanton entenatan en du funtoj da bona tritika pano, por viroj naŭonon pli, por la semajna mezumo de inaj kaj viraj plenkreskuloj almenaŭ 28.000 granojn da karbono kaj 1.330 granojn da azoto. Lia kalkulo estis praktike en surpriza maniero konfirmita de ĝia kongruo kun la mizera nutraĵkvanto, al kiu la krizo premis la konsumadon de la kotonlaboristoj. Ili ricevis en decembro 1862: 29.211 granojn da karbono kaj 1.295 granojn da azoto semajne.

En la jaro 1863 la *Privy Council* mendis enketon pri la situacio de la plej malbone nutrata parto de la angla laborista klaso. Ĝia oficiala kuracisto, d-ro Simon, elektis por tiu laboro la supre menciitan d-ron Smith. Lia enketo entenas la kampkulturistojn unuflanke, kaj aliflanke silkteksistojn, kudristinojn, ledgantfaristojn, ŝtrumpfaristojn, gantteksistojn kaj ŝuistojn. La lastaj kategorioj estas, escepte la ŝtrumpfaristojn, ekskluzive urbaj. La regulo de la enketo estis, elekti la plej sanajn kaj relative plej bonstatajn familiojn en ĉiu kategorio.

Kiel ĝenerala rezulto montriĝis, ke

> „nur en unu el la enketitaj klasoj de la urbaj laboristoj la konsumado de azoto iomete superis la minimumon, sub kiu aperas malsatmalsanoj, ke en du klasoj okazis manko, kaj pli precize en unu el ili tre granda manko je azota kiel de karbona nutraĵo, ke el la enketitaj kampkulturaj familioj pli ol kvinono ricevis malpli ol la nepran minimumon de karbona nutraĵo, pli ol triono malpli ol la nepran minimumon de azota nutraĵo kaj ke en la tri distriktoj (*Berkshire*, Oksfordŝiro kaj Somersetŝiro) regis mezume manko je la minimumo da azota nutraĵo."[150]

Inter la kampkulturaj laboristoj tiuj de Anglio, la plej riĉa parto de la Unuiĝinta Reĝlando, estis la plej malbone nutrataj.[151] La subnutriĝo inter la kampkulturaj laboristoj trafis entute ĉefe la virinon kaj infanojn, ĉar „la viro devas manĝi por plenumi sian laboron". Eĉ pli granda manko furiozis inter la enketitaj urbaj laboristaj kategorioj. „Ili estas tiom malbone nutrataj, ke devas okazi multaj kazoj de kruela kaj sandetrua nutriĝo" (ĉio ĉi nur abstinado de la kapitalisto! nome abstinado je pago de la vivrimedoj nepraj por nura vegetado de liaj brakoj!)[152]

Sekva tabelo montras la proporcion de la nutraĵa situacio de la supre menciitaj pure urbaj laboristaj kategorioj al la minimuma kvanto supozata

150 „*Public Health. Sixth Report* ktp for 1863", Londono, 1864, p. 13.

151 Saml., p. 17.

152 Saml., p. 3.

de d-ro Smith kaj al la nutraĵkvanto de la kotonlaboristo dum la tempo de sia plej granda mizero:

Ambaŭ seksoj

| | Semajnmezumo je karbono granoj | Semajnmezumo je azoto granoj |
|---|---|---|
| Kvin urbaj branĉoj | 28,876 | 1.192 |
| Senlaboraj fabrik-laboristoj de Lankaŝiro | 29.211 | 1.295 |
| Minimuma kvanto proponita por la laboristoj de Lankaŝiro por la sama nombro de viraj kaj inaj laboristoj | 28.600 | 1.330[153] |

Duono, $^{60}/_{125}$ de la enketitaj industriaj laboristkategorioj ricevis absolute nenian bieron, 28 elcentoj nenian lakton. La semajna mezumo de la likvaj nutraĵoj en la familioj variis de 7 uncoj ĉe la kudristinoj ĝis $24^{3}/_{4}$ uncoj ĉe la ŝtrumpfaristoj. La plimultoj el tiuj, kiuj ne ricevis lakton, konsistis el kudristinoj de Londono. La kvanto de la semajne konsumata pano variis de $7^{3}/_{4}$ funtoj ĉe la kudristinoj ĝis $11^{1}/_{4}$ funtoj ĉe la ŝuistoj kaj faris totalan mezumon de 9,9 funtoj semajne por plenkreskulo. Sukero (siropo ktp) variis de 4 uncoj semajne por la ledgantfaristoj ĝis 11 uncoj por ŝtrumpfaristoj; la totala semajna mezumo por ĉiuj kategorioj: 8 uncoj por plenkreskulo. Tuta semajnmezumo de butero (graso ktp): 5 uncoj por plenkreskulo. La semajnmezumo de viando (lardo ktp) variis, por plenkreskuloj, de $7^{1}/_{4}$ uncoj ĉe la silkteksistoj ĝis $18^{1}/_{4}$ uncoj ĉe la ledgantfaristoj; totala mezumo por la diversaj kategorioj: 13,6 uncoj. La semajna elspezo por nutraĵo de plenkreskulo atingis jenajn mezumajn nombrojn: silkteksistoj 2 ŝ. $2^{1}/_{2}$ d., kudristinoj 2 ŝ. 7 d., ledgantfaristoj 2 ŝ. $9^{1}/_{2}$ d., ŝuistoj 2 ŝ. $7^{3}/_{4}$ d., ŝtrumpfaristoj 2 ŝ. $6^{1}/_{4}$ d. Por la silkteksistoj de *Macclesfield* la semajna mezumo estis nur 1 ŝ. $8^{1}/_{2}$ d. La plej malbone nutrataj kategorioj estis la kudristinoj, la silkteksistoj kaj la ledgantfaristoj.[154]

153 Saml., *Appendix*, p. 232.

D-ro Simon diras en sia ĝenerala sanraporto pri tiuj faktoj:

> „Ke la kazoj estas sennombraj, en kiuj manko de nutraĵo kreas aŭ akrigas malsanojn, tion ĉiu konfirmos, kiu estas familiara kun la kuracado de malriĉuloj aŭ kun la malsanulejoj … Sed ĉi tie aldoniĝas, el saneca vidpunkto, ankoraŭ alia, tre decida cirkonstanco … Oni memoru, ke seniĝo je nutraĵo estas nur tre malvolonte eltenata kaj ke ĝenerale granda manko de nutraĵo nur postsekvas aliajn, antaŭajn malhavojn. Longe antaŭ ol la manko de nutraĵo graviĝas en la higiena bilanco, longe antaŭ ol la fiziologiisto ekpensas pri nombrado de azotaj kaj karbonaj grajnoj kiuj decidas inter vivo kaj malsatmorto, la dommastrumado estas komplete senigita je ĉia materia komforto. Vestaĵoj kaj hejtado estas tiukaze ankoraŭ pli mankhavaj ol nutraĵo. Ne sufiĉa protekto kontraŭ la akreco de la vintro; mallarĝigo de la loĝspaco ĝis grado kiu produktas aŭ gravigas malsanojn; apenaŭ spuro da mastrumiloj aŭ da mebloj, eĉ purigado mem fariĝas multekosta aŭ malfacila. Se pro memestimo oni ankoraŭ provas daŭrigi ĝin, tiam ĉiu tia provo reprezentas aldonan malsaton. La hejmo estas tie, kie loĝejo estas plej malmultekoste aĉetebla; en kvartaloj kie ĝenerale la agado de la sanpolico estas plej senefika, malplej da kloakoj, malplej da cirkulado, plej da aĉaĵoj en la strato, malplej da akvo aŭ plej malbona kaj, en urboj, plej granda manko de lumo kaj de aero. Jen la sandanĝeroj, al kiu la malriĉeco estas neeviteble elmetita, kiam ĝi estas sufiĉe malriĉa por inkludi mankon de nutraĵo. Kvankam la sumo de tiuj malbonaĵoj estas plej terura por la vivo, la nura manko de nutraĵo estas per si mem ege serioza. … Tiuj pensoj estas turmentaj, speciale se oni memoras, ke la malriĉeco, pri kiu temas, ne estas la memkulpa malriĉeco de nenifaremo. En ĉiuj kazoj ĝi estas la malriĉeco de laborantaj loĝantaroj. Efektive, koncerne la urbajn laboristojn, la laboro, per kiu ili akiras la magran nutraĵon, estas plej ofte ekscese longigata. Kaj tamen ne eblas diri, escepte en tre reduktita senco, ke tiu laboro sufiĉas por vivteni ilin. … Laŭ tre granda skalo la nominala vivtenado povas esti nur pli ol malpli longa ĉirkaŭvojo al paŭpereco."[155]

La interna ligo inter malsato de la plej diligentaj laboristaj tavoloj kaj kruda aŭ rafinita malŝpar-konsumo de la riĉuloj, bazita sur kapitalisma akumulado, malkaŝiĝas nur al tiu, kiu konas la ekonomiajn leĝojn. Alie statas pri la loĝkondiĉoj. Ĉiu senantaŭjuĝa observanto vidas, ke ju pli amasa la centralizo de la produktadrimedoj estas, des pli grandas la responda amasiĝo de laboristoj en la sama spaco, ke do, ju pli la kapitalisma akumulado rapidas, des pli mizeriĝas la loĝkondiĉoj de la laboristoj. La plibonigoj kaj beligoj (*improvements*) de la urboj – kiuj akompanas la progreson de la riĉeco – per forigo de malbone konstruitaj kvartaloj, starigo de palacoj por bankoj, vardomoj ktp, rektigo de la stratoj por

154 Saml., p. 232, 233.

155 Saml., p. 14, 15.

komerca trafiko kaj luksaj kaleŝoj, enkonduko de ĉevale tirataj tramoj ktp, forpelas la malriĉulojn en eĉ pli malbonajn kaj pli superloĝatajn lokaĵojn. Aliflanke ĉiu scias, ke la multkosteco de la loĝejo estas en inversa proporcio al ilia kvalito kaj ke la minejoj de la mizero estas ekspluatataj de domspekulistoj per pli da profito kaj malpli da kostoj ol iam ajn la minejoj de Potosio[156]. La antagonisma karaktero de la kapitalisma akumulado kaj do de la kapitalismaj proprietrilatoj entute[157] estas tie tiom palpebla, ke eĉ en la oficialaj anglaj raportoj pri tiu temo svarmas la malortodoksaj atakoj kontraŭ la „proprieto kaj ĝiaj rajtoj”. Tiu malbonaĵo tiom sampaŝis kun la evoluo de la industrio, de la akumulado de la kapitalo, la kresko kaj la „plibeligo” de la urboj, ke la nura timo antaŭ kontaĝaj malsanoj, kiuj ankaŭ la „respektatulojn” ne evitas, naskis de 1847 ĝis 1864 ne malpli ol dek sanpolicajn parlamentajn leĝojn kaj en kelkaj urboj, ekz-e Liverpulo, Glasgo ktp, la timigita burĝaro devigis sian urban administradon interveni. Tamen, d-ro Simon en sia raporto de 1865 diras: „Ĝenerale dirite, la malbonaĵoj en Anglio estas ne kontrolataj.” Laŭ mendo de la *Privy Council* okazis en 1864 enketo pri la loĝkondiĉoj de la kamplaboristoj, 1865 pri tiu de la malriĉaj klasoj en la urboj. La majstrajn laboraĵojn de d-ro Julian Hunter troviĝas en la sepa kaj oka raporto pri la publika sano. Poste mi revenos al la kamplaboristoj. Pri la urbaj loĝkondiĉoj mi citu unue ĝeneralan rimarkon de d-ro Simon:

> „Kvankam mia oficiala vidpunkto”, diras li, „estas ekskluzive kuracista, la plej ordinara humaneco ne permesas ignori la alian flankon de tiu malbonaĵo. En sia pli alta grado [t.e. troloĝateco] ĝi preskaŭ necese implicas tian neadon de ĉia delikateco, tiom malpuran miksaĵon de korpoj kaj korpaj funkcioj, tioman elmontradon de animala kaj seksa nudeco, ke ĝi estas pli besta ol homa. Esti submetita al tiaj influoj, estas malnobligo, kiu des pli profundiĝas, ju pli longe ĝi daŭras. Por la infanoj, kiuj naskiĝis sub tiu malbenaĵo, ĝi estas bapto al fieco (*baptism into infamity*). Kaj super ĉia mezuro senespera estas la deziro, ke personoj metitaj en tiajn kondiĉojn strebu alirilate al tiu etoso de civilizacio, kies esenco konsistas en korpa kaj morala pureco.”[158]

La unuan rangon je troŝarĝitaj aŭ por homa loĝado absolute maleblaj loĝejoj okupas Londono.

156 Originale: *Potosí*, urbo en Bolivio, fondita en 1545, kies brila estinteco (16-a kaj 17-a jarcentoj) estas ŝuldata al la ekspluatado de la tieaj arĝentminejoj. -vl

157 „Nenie la rajtoj de la persono estis tiom malkaŝe kaj tiom senhonte oferataj ol en la loĝkondiĉoj de la laboranta klaso. Ĉiu granda urbo estas la sanktejo de homofero, altaro, sur kiu miloj estas ĉiujare oferataj al la moloĥo de la posedavido.” (S. Laing, l.c., p. 150)

158 „*Public Health. Eight Report*”, Londono, 1866, p. 14, noto.

„Du punktoj”, diras d-ro Hunter, „estas certaj; unue ekzistas proksimume 20 grandaj kolonioj en Londono, ĉiu de proksimume 10.000 personoj, kies mizera situacio superas ĉion, kio iam ajn aliie estis vidita en Anglio, kaj ĝi estas preskaŭ tute la rezulto de ilia malbonaj loĝkondiĉoj; due, la superplena kaj kaduka stato de la domoj de tiuj kolonioj estas multe pli malbona ol 20 jarojn antaŭe.”[159] „Ne estas diri tro, ke la vivo en multaj partoj de Londono kaj de *Newcastle* estas infera.”[160]

Ankaŭ la pli bonstata parto de la laborista klaso, kune kun etkomercistoj kaj aliaj elementoj de la malgranda meza klaso, falas en Londono pli kaj pli sub la malbenon de tiuj malindaj loĝkondiĉoj, laŭ la mezuro, kiel la „plibonigoj” progresas kaj kun ili la malkonstruado de malnovaj stratoj kaj domoj, kiel fabrikoj kaj homalfluo en la metropolo kreskas, kaj fine la dom-luprezoj kun la urba grundrento altiĝas.

„Luprezoj fariĝis tiom altegaj, ke malmultaj laboristoj povas pagi pli ol unu ĉambron.”[161]

Ekzistas preskaŭ neniu londona domproprieto, kiu ne estas ŝarĝita de granda nombro de makleristoj [„*middlemen*”]. Nome la prezo de la grundo en Londono estas tre alta kompare kun ĝiaj jaraj enspezoj, per tio ke ĉiu aĉetanto spekulas revendi ĝin pli aŭ malpli frue je prezo de ĵurio (*Jury Price*, kvoto fiksita de ĵurianoj ĉe eksproprietigoj) aŭ per proksimeco de ia granda entrepreno atingi eksterordinaran valoraltiĝon. Sekvo de tio estas regula komerco per aĉetado de lukontraktoj kies findato proksimiĝas.

„De la sinjoroj de tiu metio atendeblas, ke ili agas tiel kiel ili agas, nome elpremi ĉion eblan el la domloĝantoj kaj lasi kiom eble malmulte al siaj posteuloj.”[162]

La luadoj estas semajnaj, kaj la sinjoroj nenion riskas. Sekve al la konstruado de fervojoj en la urbo

---

159 Saml., p. 89. Koncerne la infanojn en tiuj kolonioj d-ro Hunter diras: „Ni ne scias, kiel infanoj elkreskis antaŭ tiu ĉi epoko de densa kunloĝigo de malriĉuloj, kaj tiu estus aŭdaca profeto, kiu volus antaŭdiri, kian konduton oni povas atendi de infanoj, kiuj en senparalelaj kondiĉoj en tiu ĉi lando nun trairas sian edukadon por estonta praktiko kiel danĝeraj klasoj, sidante tra la duona nokto kun personoj de ĉiu aĝo, ebriaj, obscenaj kaj kverelemaj.” (saml., p. 56)

160 Saml., p. 62.

161 „*Report of the Officer of Health of St. Martin's in the Fields*, 1865.”

162 „*Public Health. Eighth Report*, Londono, 1866”, p. 91.

> „oni vidis antaŭ nelonge en Orient-Londono nombron da familioj elpelitaj el siaj malnovaj loĝejoj iun sabatvesperon vagadi kun siaj malmultaj havaĵoj surdorse, sen ia ajn haltejo krom la azilo”.[163]

Tiuj labordomoj estas jam superplenaj, kaj la „plibonigoj” jam atribuitaj de la parlamento estas nur ekrealigataj. Kiam la laboristoj estas elpelitaj per detruado de siaj malnovaj domoj, tiam ili ne forlasas sian paroĥon aŭ ekloĝas almenaŭ en ties najbareco, kiom eble plej proksime.

> „Ili kompreneble provas loĝi kiom eble plej proksime de siaj laborlokoj. La sekvo estas, ke anstataŭ du ĉambroj, unu devas akcepti la familion. Eĉ ĉe pli alta luprezo la loĝado fariĝas pli malbona ol la malbona, el kiu oni elpelis ĝin. La duono de la laboristoj en la *Strand* bezonas jam du mejlojn por atingi sian laborejon.”

Tiu *Strand*, kies ĉefstrato faras al la fremdulo imponan impreson pri la riĉeco de Londono, povas servi kiel ekzemplo kiel oni en Londono kunpakas homojn. En unu el ĝiaj paroĥoj la sanoficisto nombris po 581 personojn sur ĉiu akreo, kvankam la duono de la Tamizo estis enkalkulita. Evidentas, ke ĉiu sanpolica dispono, kiu, kiel okazas ĝis nun en Londono, per malkonstruo de maltaŭgaj domoj elpelas la laboristojn el iu kvartalo, servas nur por des pli dense kunpremi ilin en alia kvartalo.

„Aŭ”, diras d-ro Hunter, „la tuta proceduro devas kiel absurdaĵo nepre halti, aŭ la publika simpatio (!) devas vekiĝi por tio, kio sen troigo nomeblas nacia devo, nome havigi loĝejon por homoj, kiuj pro manko de kapitalo ne povas mem akiri ĝin, sed ja povas per perioda pagado kompensi al tiuj, kiuj akiras ĝin por ili.”.[164]

Oni admiru la kapitalisman jursistemon! La grundproprietulo, proprietulo de domo, komercisto, kiam li estas senproprietigata pro „plibonigoj”, ekz-e fervojoj, novkonstruado de vojoj ktp, ricevas ne nur plenan kompenson. Li krome konsolendas pro sia devigata „abstinenco”, pro homa kaj dia leĝo, per bona profito. La laboristo estas elĵetata kun edzino, infanoj kaj havaĵoj kaj – se li tro amase venas al urbaj kvartaloj, kie la urba administracio insistas pri deco, li estas sanpolice persekutata!

Krom Londono komence de la 19-a jarcento ekzistis eĉ ne unu urbo en Anglio kun cent mil loĝantoj. Nur kvin havis pli ol 50.000. Nun ekzistas 28 urboj kun pli ol 50.000 loĝantoj.

> „La rezulto de tiu ŝanĝo estis ne nur eksterordinara kresko de la urba loĝantaro, sed la malnovaj densaj urbetoj estas nun centroj ĉiuflanke ĉirkaŭkonstru-

163 Saml., p. 88.

164 Saml., p. 89.

> itaj, nenie kun aliro de libera aero. Ĉar ili jam ne estas agrabaj por la riĉuloj, tiuj forlasas ilin kaj iras al pli amuzaj antaŭurboj. La posteuloj de tiuj riĉuloj ekloĝas en la pli grandaj domoj, kun po unu familio, ofte eĉ kun subluantoj, por ĉiu ĉambro. Tiel loĝantaro estis premata en domojn, kiuj ne estis konstruitaj por ili kaj por kiuj ili estas tute maltaŭgaj, kun medio, kiu estas vere humiliga por la plenkreskuloj kaj ruiniga por la infanoj."[165]

Ju pli rapide la kapitalo en industria aŭ komerca urbo akumuliĝas, des pli rapidas la alfluo de la ekspluatebla hommaterialo, des pli mizeriĝas la improvizitaj loĝejoj de la laboristoj. *Newcastle-upon-Tyne*, kiel centro de konstante pli profitiga karb- kaj minej-distrikto, okupas do post Londono la duan lokon en la loĝejinfero. Ne malpli ol 34.000 homoj loĝaĉas tie en unuopaj kameroj. Pro sia absoluta danĝero por la komunumo, konsiderinda nombro da domoj estis lastatempe detruita de la instancoj de *Newcasle* kaj *Gateshead*. La konstruado de la novaj domoj progresas tre malrapide, la komerco tre rapide. Pro tio la urbo estis en 1865 pli troplena ol iam ajn. Apenaŭ aparta kamero estis luebla. D-ro Embleton de la malsanulejo por februloj de *Newcastle* diras:

> „Sen ajna dubo la kaŭzo de la daŭro kaj disvastiĝo de la tifo troviĝas en la troa amasiĝo de homaj estaĵoj kaj en la malpureco de iliaj loĝejoj. La domoj, en kiuj la laboristoj vivas, troviĝas en fermitaj angulstratetoj kaj kortoj. Ili estas koncerne lumon, aeron, spacon kaj purecon veraj modeloj de manko kaj de malsano, honto por ĉiu civilizita lando. Viroj, virinoj kaj infanoj kuŝas dumnokte tie intermiksite. Koncerne la virojn, la nokta laborvico sekvas la tagan vicon seninterrompe, tiel ke la litoj trovas apenaŭ tempon por malvarmiĝi. La domoj estas malbone provizitaj je akvo kaj pli malbone je necesejoj, malpuraj, ne aerumitaj, pestecaj.[166]

La semajna luprezo por tiaj truoj altiĝas de 8 pencoj al 3 ŝilingoj.

> „*Newcastle-upon-Tyne*", diras d-ro Hunter, „montras la ekzemplon de unu el la plej belaj triboj de niaj samlandanoj, kiu per la eksteraj cirkonstancoj de loĝado kaj de strato ofte droniĝis en preskaŭ sovaĝan malboniĝon."[167]

Pro la alfluado kaj defluado de kapitalo kaj laboro la stato de loĝejo en industria urbo povas esti hodiaŭ eltenebla, morgaŭ ĝi fariĝas abomeninda. Se la urbestraro fine decidis fari klopodojn por forigi la plej akrajn misojn, morgaŭ jen mizeraj irlandanoj aŭ malriĉegaj anglaj kampkulturaj laboristoj enmigras kvazaŭ svarmo de akridoj. Oni forstokas ilin en kelojn aŭ subtegmentejojn aŭ transformas la antaŭe respektindan laboristan

165 Saml., p. 56.

166 Saml., p. 149.

167 Saml., p. 50.

domon en provizoran loĝejon, kies personaro ŝanĝiĝas senĉese. Jen ekzemplo: *Bradford*. Tie la administra filiŝtro ĵus okupiĝis pri urbreformo. Krome ekzistis tie en 1861 ankoraŭ 1.751 neloĝataj domoj. Sed nun revenis la bona komerco, pri kiu la milde liberala s-ro Forster, la nigrulamiko, antaŭ nelonge tiom bele kokokriis. Kun la bona komerco venis kompreneble inundo per la ondoj de la ĉiam ondanta „rezervarmeo” aŭ „relativa superloĝantaro”. La abomenaj kelloĝejoj kaj kameroj, registritaj en la listo[168], kiun d-ro Hunter ricevis de agento de asekursocieto, estis priloĝataj plejofte de bone pagataj laboristoj. Ili deklaris, ke ili volonte pagus por pli bonaj loĝejoj, se ili estus haveblaj. Intertempe ili kadukiĝas kaj ĉiuj malsaniĝas, dum la milde liberala Forster, parlamentano, verŝas

168 *Listo de la makleristo de laborist- kaj asekur-societo en Bradford.*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Vulcanstreet, n-ro 122 | 1 ĉambro | 16 personoj | |
| Lumleystreet, n-ro 13 | 1 ĉambro | 11 personoj | |
| Bowrstreet, n-ro 41 | 1 ĉambro | 11 personoj | |
| Portlandstreet, n-ro 112 | 1 ĉambro | 10 personoj | |
| Hardystreet, n-ro 17 | 1 ĉambro | 10 personoj | |
| Northstreet, n-ro 18 | 1 ĉambro | 16 personoj | |
| same, n-ro 17 | 1 ĉambro | 13 personoj | |
| Wymerstreet, n-ro 19 | 1 ĉambro | 8 plenkreskuloj | |
| Jowettstreet, n-ro 19 | 1 ĉambro | 12 personoj | |
| Georgestreet, n-ro 150 | 1 ĉambro | 3 familioj | |
| Rifle Court, Marygate, n-ro 11 | | 1 ĉambro | 11 personoj |
| Marshallstreet, nr-o28 | 1 ĉambro | 10 personoj | |
| same, n-ro 49 | 3 ĉambroj | 3 familioj | |
| Georgestreet, n-ro 128 | 1 ĉambro | 18 personoj | |
| same, n-ro 130 | 1 ĉambro | 16 personoj | |
| Edwardstreet, n-ro 4 | 1 ĉambro | 17 personoj | |
| [Georgestreet, n-ro 49 | 1 ĉambro | 2 familioj] | |
| Yorkstreet, n-ro 34 | 1 ĉambro | 2 familioj | |
| Salt Piestreet | 2 ĉambroj | 26 personoj | |

**Keloj**

| | | | |
|---|---|---|---|
| Regent Square 1 | 1 kelo | 8 personoj | |
| Acrestreet | 1 kelo | 7 personoj | |
| Robert’s Court, n-ro 33 | 1 kelo | 7 personoj | |
| Back Prattstreet uzata kiel | kuproforĝejo | 1 kelo | 7 personoj |
| Ebenezerstreet, n-ro 27 | 1 kelo | 6 personoj | |

ĝojlarmojn pri la benoj de la liberkomerco kaj pri la profitoj de la eminentaj bradfordaj kapoj, kiuj profitas per komblana fadeno. En la raporto de la 5-a de septembro 1865 d-ro Bell, unu el la kuracistoj por malriĉuloj de *Bradford*, klarigas la teruran mortadon de la febromalsanuloj de lia distrikto per iliaj loĝkondiĉoj:

> „En kelo de 1.500 kubikfutoj loĝas 10 personoj … La Vincentstrato, *Green Air*-Placo kaj *the Leys* inkludas 223 domojn kun 1.450 loĝantoj, 435 litoj kaj 36 necesejoj … La litoj, kaj per tio mi komprenas ĉian rulaĵon de malpuraj ĉifonoj aŭ manplenon da rabotaĵoj, akceptas mezume 3,3 personojn, kelkaj 4 kaj 6 personojn. Multaj dormas sen lito sur la nuda planko en siaj vestaĵoj, junaj viroj kaj virinoj, ĉu geedzaj aŭ ne, ĉiuj pelmele. Ĉu necesas aldoni, ke multaj el tiuj loĝejoj estas mallumaj, malpuraj, fetoraj truoj, ekstreme maltaŭgaj por homa loĝado; ili estas la centroj el kiuj malsano kaj morto distribuiĝas ankaŭ inter tiuj vivantaj en pli bonaj cirkonstancoj, kiuj permesis al tiuj pestejoj infekti meze de ni.”[169]

Bristolo havas la trian rangon post Londono en la loĝmizero.

> „Ĉi tie, en unu el la plej riĉaj urboj de Eŭropo, plej granda abundo je plej akra malriĉeco (*blank poverty*) kaj hejma mizero.”[170]

## *c) La migruloj*

Ni turnas nin nun al popoltavolo, kies origino estas kampara, kies okupiĝo estas grandparte industria. Ĝi konsistigas la malpezan infanterion de la kapitalo, kiu ĝin ĵetas laŭ sia bezono jen sur tiun punkton, jen sur tiun ĉi. Kiam ĝi ne estas survoje, ĝi „kampas”. La migra laboro estas konsumata por diversaj operacioj de konstruado kaj drenado, brikfarado, kalkbruligado, konstruado de fervojoj ktp. Migranta kolono de pesto, ĝi importas en loĝlokojn, en kies najbareco ĝi kampas, variolon, tifon, ĥoleron, skarlatinon ktp.[171] En entreprenoj kun konsiderinda kapital-elspezo, ekz-e fervojoj ktp, la entreprenisto liveras plej ofte mem al sia armeo lignajn kabanojn aŭ ion similan, improvizitajn vilaĝojn sen ajna sanprizorgo, transe de kontrolado de la lokaj instancoj, tre profitige por la sinjoro kontraktisto, kiu ekspluatas la laboristojn duoble, kiel industri-soldatojn kaj kiel luantojn. Laŭ tio, ĉu la ligna kabano entenas 1, 2 aŭ 3 truojn, ĝia loĝanto, terlaboristo ktp, devas pagi 2, 3, 4 ŝilingojn

169 Saml., p. 114.

170 Saml., p. 50.

171 „*Public Health. Seventh Report*”, Londono, 1865, p. 18.

semajne.[172] Jen ekzemplo. En septembro 1864, laŭ la raporto de d-ro Simon, la sekva denunco flanke de la prezidanto de la Sanpolica Komitato de la pastrejo de *Sevenoaks* atingis la ministron pri internaj aferoj, Sir George Grey:

> „Kazoj de variolo estis en tiu ĉi paroĥo apenaŭ nekonata ĝis proksimume antaŭ 12 monatoj. Mallonge antaŭ tio malfermiĝis laboroj por fervojo de *Lewisham* ĝis *Tunbridge*. Krom ke la ĉefaj laboroj fariĝis en la rekta apudeco de tiu ĉi urbo, oni konstruis ankaŭ ĉi tie la ĉefstokejon de la tuta projekto, pro tio granda nombro da personoj estis ĉi tie laborigita. Ĉar ne eblis loĝigi ĉiujn en kabanoj, la kontraktisto, s-ro Jay, muntigis budojn en diversaj punktoj laŭlonge de la linio por loĝigi la laboristojn. Tiuj budoj havis nek aerumadon nek defluilojn kaj krome estis nepre superplenaj, ĉar ĉiu luanto devis akcepti aliajn loĝantojn, egale kiom nombra lia propra familio estis, kaj kvankam ĉiu budo estis nur duĉambra. Laŭ la kuracista raporto, kiun ni ricevis, la sekvo estis ke tiuj kompatinduloj devis dum la nokto suferi ĉiajn turmentojn de sufokiĝo, por eviti la pestecajn odorojn el la malpura stagnanta akvo kaj de la necesejoj tuj sub la fenestroj. Fine oni enmanigis al nia komitato plendojn de kuracisto, kiu havis okazon viziti tiujn budojn. Li parolis pri la stato de tiuj tiel nomataj loĝejoj en plej amaraj esprimoj kaj timis tre seriozajn sekvojn, se oni ne farus kelkajn prisanajn disponojn. Antaŭ proksimume jaro s-ro Jay promesis aranĝi domon, en kiun la personoj dungitaj de li estus tuj izolendaj, ekde kiam ili malsaniĝus je kontaĝaj malsanoj. Li ripetis tiun promeson fine de lasta julio, sed faris neniam la plej etan paŝon por plenumi ĝin, kvankam de tiu dato okazis diversaj kazoj de variolo kaj en ties sekvo du personoj mortis. La 9-an de septembro la kuracisto Kelson raportis al mi kromajn kazojn de variolo en la samaj budoj kaj priskribis ilian staton horora. Por Via [de la ministro] informo mi devas aldoni, ke nia pastrejo posedas izolitan domon, la tiel nomatan pestdomon, en kiu oni flegas la paroĥanojn suferantajn je kontaĝaj malsanoj. Tiu domo estas nun de monatoj konstante superplena de pacientoj. En unu familio mortis kvin infanoj pro variolo kaj febro. De la 1-a de aprilo ĝis la 1-a de septembro de tiu ĉi jaro okazis en la paroĥo ne malpli ol dek mortoj pro variolo, kvar en la menciitaj budoj. Maleblas indiki la nombron da malsaniĝoj, ĉar la koncernataj familioj tenas ilin kiom eble plej sekretaj."[173]

---

172 Saml., p. 165.

173 Saml., p. 18, noto. La malriĉul-flegisto de la *Chapel-en-le-Frith-Union* raportas al la Ĝenerala Registro jene: En *Doveholes* oni faris nombron da malgrandaj kavoj en granda monteto el kalkcindro. Tiuj kavoj servas al la laboristoj dungitaj ĉe teraj kaj aliaj laboroj en la kadro de la fervojkonstruado kiel loĝejo. La kavoj estas striktaj, malsekaj, sen elfluaĵo por malpuraĵoj kaj sen necesejoj. Ili ĉiuj estas sen aerumado, kun escepto de truo tra la volbaĵo, kiu servas samtempe kiel kamentubo. La variolo furiozas kaj kaŭzis jam plurajn mortintojn" (inter la trogloditoj). (saml., noto 2.)

La laboristoj en karbaj kaj aliaj minejoj apartenas al la plej bone pagataj kategorioj de la brita proletaro. Je kia prezo ili aĉetas sian salajron, tio estis montrita en antaŭa loko.[174] Mi ĵetas ĉi tie rapidan rigardon sur iliajn loĝkondiĉojn. Ĝenerale la ekspluatisto de la minejo, ĉu ties proprietulo aŭ luanto, konstruigas certan nombron da kabanoj por siaj laboristoj. Ili ricevas la kabanojn kaj karbon por hejtado „senpage", tio signifas ke tiuj konsistigas parton de la salajro liverata per naturaĵoj. Tiuj, kiuj ne loĝigeblas tiel, ricevas kompense 4 pundojn jare. La minejdistriktoj altiras rapide grandan loĝantaron, konsistantan el la mineja loĝantaro mem kaj la metiistoj, komercistoj ktp, kiuj grupiĝas ĉirkaŭ ili. Kiel ĉie, kie la loĝantaro estas densa, la grundrento estas ĉi tie alta. La minejentreprenisto provas do konstruigi sur kiom eble plej mallarĝa loko apud la ŝakto kiom eble plej multajn kabanojn, sufiĉajn por kunpaki siajn laboristojn kun ties familioj. Se novaj ŝaktoj malfermiĝas proksime aŭ malnovaj estas reaktivigataj, tiam la kunpremiĝo kreskas. Ĉe la kunstrado de la kabanoj regas nur unu vidpunkto, „abstinenco" de la kapitalisto je ĉiaj absolute neeviteblaj elspezoj de kontanta mono.

> „La loĝejoj de la ŝakt- kaj aliaj laboristoj, kiuj estas ligitaj kun la minejoj de *Northumberland* kaj *Durham*", diras d-ro Julian Hunter, „estas mezume eble la plej malbona kaj plej multekosta, kion Anglio grandskale prezentas tiurilate, tamen kun la escepto de similaj distriktoj en *Monmouthshire*. La ekstrema malbono troviĝas en la alta nombro da homoj, kiuj plenigas unu ĉambron, en la mallarĝeco de la konstruejo sur kiun oni ĵetas grandan domamason, en la manko de akvo kaj foresto de necesejoj, en la tre ofte uzata metodo meti unu domon super la alian aŭ dividi ilin en *flats* (tiel ke la diversaj vertikale supermetitaj kabanoj estigas etaĝojn) … La entreprenisto traktas la tutan kolonion, kvazaŭ ĝi nur kampus, ne loĝus."[175] „En plenumado de miaj instrukcioj", diras d-ro Stevens, „mi vizitis la plej multajn grandajn minejvilaĝojn de la *Durham Union* … Kun tre malmultaj esceptoj, la konstato validas por ĉiuj, ke ĉia rimedo por certigi la sanon de la loĝantoj estas neglektata … Ĉiuj minejlaboristoj estas al la luanto (*lessee*) aŭ proprietulo de la minejo por 12 monatoj ligitaj" (*bound*, esprimo, kiu kiel *bondage* [servuteco] devenas el la epoko de la servuteco). „Se ili manifestas sian malkontenton aŭ iel ĝenas la kontroliston (*viewer*), tiam tiu metas markon aŭ ian memorandon post la nomon en la kontrollibro kaj maldungas ilin ĉe la jara novligado … Ŝajnas al mi, ke neniu parto de la '*truck*'-sistemo povas esti pli malbona ol tiu kiu regas en tiu ĉi dense priloĝataj distriktoj. La laboristo estas devigata

174 La detaloj indikitaj sur p. 460 sj koncernas nome laboristojn en karbminejoj. Pri la ankoraŭ pli malbona situacio en la metalminejoj kp la konsciencan raporton de la Reĝa Komisiono de 1864.

175 Saml., p. 180, 182.

akcepti kiel parton de sia salajro domon ĉirkaŭatan de pestaj influoj. Li ne povas helpi sin mem. Li estas ĉiurilate servutulo (*he is to all intents and purpose a serf*). Ŝajnas dubinde, ĉu iu alia povas helpi lin krom lia proprietulo, kaj tiu proprietulo konsultas antaŭ ĉio sian bilanckonton, kaj la rezulto estas sufiĉe celtrafa. La laboristo ricevas de la proprietulo ankaŭ sian kontingenton da akvo. Egale, ĉu ĝi estas bona aŭ malbona, ĉu ĝi estas liverata aŭ ne, li devas pagi por ĝi aŭ pli ĝuste toleri dekalkulon de sia salajro."[176]

En konflikto kun la „publika opinio" aŭ eĉ kun la sanpolico la kapitalo tute ne hezitas „pravigi" la parte danĝerajn, parte humiligajn kondiĉojn, en kiujn ĝi tenas funkciadon kaj loĝadon de la laboristo, dirante ke tio necesas por ekspluati lin pli profite. Ekzemple, kiam ĝi „abstinas" je instalaĵoj de protekto kontraŭ danĝera maŝino en la fabriko, je aerumaj kaj sekurecaj rimedoj en la minejoj ktp. Same ĉi tie pri la loĝejoj de la minej-laboristoj.

„Kiel senkulpigo", diras d-ro Simon, la kuracista oficisto de la *Privy Council*, en sia oficiala raporto, „kiel senkulpigo por la mizeraj loĝkondiĉoj oni argumentas, ke minejoj estas kuime ekspluatataj per luado, ke la daŭro de la lukontrakto (en karbminejoj plej ofte 21 jaroj) estas tro mallonga por ke la minejluanto konsideru ke valoras la penon liveri bonajn loĝkondiĉojn al siaj laborantoj kaj al la metiistoj ktp, kiujn la entrepreno altiras; ke eĉ se li mem havus la intencon tiurilate procedi liberale, ĝi estus malebligata de la grundproprietulo. Ĉar tiu tendencas tuj postuli eksterordinaran kromrenton por la privilegio konstrui decan kaj komfortan vilaĝon sur la grundsurfaco por loĝigi la prilaborantojn de la subtera proprieto. Tiu eksterordinara prezo, se ne rekta malpermeso, fortimigas ankaŭ aliajn, kiuj alie ja ŝatus konstrui … Mi ne volas esplori la valoron de tiu senkulpigo, ankaŭ ne, kiun lastmane trafus la devo pagi la kroman elspezon por deca loĝado, ĉu la grundproprietulon, la minejluanton, la laboriston aŭ la publikon … Sed vide al tiaj hontindaj faktoj, kiujn la kunmetitaj raportoj" (de d-ro Hunter, Stevens ktp) „malkaŝas, oni devas apliki kuracilon … Oni tiel uzas titolojn de grundproprieto por fari grandan publikan maljustaĵon. En sia kvalito de minejproprietulo la grundproprietulo invitas industrian kolonion por labori sur lia proprieto kaj poste, en sia kvalito kiel proprietulo de la grundsurfaco, malebligas al la laboristoj, kiujn li kunigis, trovi taŭgan loĝadon nepran por sia vivo. La minejluanto" (la kapitalisma ekspluatanto) „ne havas monintereson kontraŭstari tiun dividon de la afero, ĉar li bone scias, ke, se ties pretendoj estas eksterordinaraj, la sekvoj ne falos sur lin, ke la laboristoj, sur kiuj ili falas, estas tro needukitaj por koni siajn prisanajn rajtojn, kaj ke nek la plej obscena loĝkondiĉo nek plej putra trinkakvo iam ajn kaŭzis strikon."[177]

176 Saml., p. 515, 517.

177 Saml., p. 16.

## d) Efiko de la krizoj sur la plej bone pagatan parton de la laborista klaso

Antaŭ ol transiri al la terkulturaj laboristoj en la propra senco, mi ŝatus ankoraŭ montri, kiel la krizoj efikas eĉ al la plej bone pagata parto de la laborista klaso, al ties aristokrataro. Oni memoru: la jaro 1857 alportis unu el la grandaj krizoj, per kiuj la industria ciklo ĉiufoje finiĝas. La sekva okazo estis atendebla por 1866. Jam diskontita en la veraj fabrik-distriktoj per la kotonmizero, kiu pelis multan kapitalon el la kutima investsfero al la grandaj centraj sidejoj de la monmerkato, la krizo alpren-is ĉi-foje precipe financan karakteron. Ĝia erupcio en majo 1866 estis signita de bankroto de londona bankego, kiun tuj postsekvis la bankroto de sennombraj financaj spekulsocietoj. Unu el la grandaj londonaj indu-stribranĉoj, kiujn la katastrofo trafis, estis la konstruado de ferŝipoj. Dum la tempo de granda spekulado, la magnatoj de tiu branĉo ne nur produktis super ĉia mezuro, sed krome subskribis tre grandajn liver-kontraktojn spekulante, ke la kreditfontoj daŭre kaj sam-abunde fluos. Kaj jen aperis terura reago, kiu ankaŭ en aliaj londonaj industrioj[178] daŭras ĝis tiu ĉi momento, fine de marto 1867. Por karakterizi la situacion de la laboristoj, mi citu la sekvan teksteron el la detala raporto de korespondanto de la *Morning Star*, kiu vizitis komence de 1867 la ĉefsidejojn de la sufero.

> „En la oriento de Londono, la distriktoj de *Poplar*, *Millwall*, *Greenwich*, *Deptford*, *Limehouse* kaj *Canning Town*, troviĝas almenaŭ 15.000 laboristoj kun siaj familioj en stato de plej ekstrema mizero, inter ili pli ol 3.000 lertaj meĥanikistoj. Iliaj rezervaj fondusoj estas elĉerpitaj pro ses- aŭ ok-monata senlaboreco … Mi havis grandan penon atingi ĝis la pordego de la azilo (de *Poplar*), ĉar antaŭ ĝi troviĝis densa amaso de malsatuloj. Ili atendis pan-kuponojn, sed la tempo de distribuado ankoraŭ ne venis. La korto konsistis el

178 „Amasa malsatmortado de londonaj malriĉuloj! (*Wholesale starvation of the London Poor*!) … Dum la lastaj tagoj la muroj de Londono estis surgluitaj per grandaj afiŝoj, kun la stranga anonco: – «Grasaj bovoj, malsatmortantaj homoj! La grasaj bovoj forlasis siajn vitrajn palacojn por nutri la riĉulojn en ties luksaj ĉambroj, dum la malsatmortantaj homoj estas lasitaj al pereo kaj malsatmortas en siaj mizeraj truoj.» La afiŝoj kun tiu malbonaŭgura skribo estas konstante renovigataj. Apenaŭ parto estas forigita kaj surgluita, tuj reaperas nova parto en la sama aŭ same publika loko. … Tio memorigas la omenojn, kiuj preparis la francan popolon por la okazaĵoj de 1789 … En tiu ĉi momento, dum anglaj laboristoj kun virino kaj idoj mortas pro malvarmo kaj malsato, milionoj da angla mono, la produkto de angla laboro, estas plasata en rusaj, hispanaj, italaj kaj aliaj fremdaj pruntaĵoj.” (*Reynolds*’ *Newspaper*, la 20-an de januaro 1867)

granda kvadrato kun pupitra tegmento ĉirkaŭ la muroj. Dika tavolo de neĝo kovris la pavimŝtonojn en la mezo de la korto. Tie iaj placetoj estis ĉirkaŭbaritaj per salika plektaĵo, kvazaŭ ŝafbariloj, en kiuj la viroj laboris dum pli bona vetero. En la tago de mia vizito la bariloj estis tiom plenaj de neĝo, ke neniu povis sidi en ili. Sed sub la elstaranta tegmento la viroj estis okupataj per makadamigo de pavimŝtonoj. Ĉiu havis dikan pavimŝtonon kvazaŭ sidilon kaj martelis per dika martelo sur la prujnokovritan graniton, ĝis li estis debatinta 5 buŝelojn[179] da ĝi. Tiam lia taglaboro estis finita kaj li ricevis 3 pencojn[180] kaj kuponon por pano. En alia parto de la korto staris kaduka ligna dometo. Malfermante ĝian pordon, ni trovis ĝin plena de viroj, premantaj sin ŝultron ĉe ŝultro, por teni sin varmaj per la korpa varmo kaj la spiro. Ili disfadenigis ŝipŝnuregojn kaj disputis inter si, kiu el ili povas plej longe labori kun minimumo da nutraĵo, ĉar eltenkapablo estis la kriterio de honoro. Sole en tiu azilo 7.000 ricevis subtenon, inter ili multaj centoj, kiuj antaŭ ses aŭ ok monatoj perlaboris la plej altajn salajron de metiistoj en tiu ĉi lando. Ilia nombro estus duoble alta, se ne ekzistus same multaj, kiuj post elĉerpiĝo de siaj tutaj monrezervoj tamen rifuzas iri al la paroĥo, se ili havas ankoraŭ ian havaĵon por lombardi. Forirante de la azilo mi ankoraŭ iom promenis tra la stratoj de plej ofte unuetaĝaj domoj, kiuj estas tiom multnombraj en *Poplar*. Mia gvidanto estis membro de la Komitato por Senlaboruloj. La unua domo, kiun ni eniris, estis tiu de ferlaboristo, de 27 semajnoj senlabora. Mi trovis la viron kun lia tuta familio sidanta en malantaŭa ĉambro. La ĉambro estis ankoraŭ ne tute sen mebloj, kaj estis fajro en ĝi. Tio necesis por protekti la piedojn de la junaj infanoj kontraŭ frostiĝo, ĉar estis akre malvarma tago. Sur telero kontraŭa al la fajro kuŝis kvanto da stupo, kiun la virino kaj la infanoj deplukis anstataŭ la panon de la azilo. La viro laboris en unu el la supre priskribitaj kortoj por pankupono kaj tri pencoj tage. Li estis nun veninta hejmen por tagmanĝo, tre malsata, kiel li diris al ni kun amara rideto, kaj lia tagmanĝo konsistas el kelkaj pantranĉoj kun porka graso kaj taso da senlakta teo … La posta pordo, ĉe kiu ni frapis, malfermiĝis de mezaĝa virino, kiu, sen diri vorton, kondukis nin en malgrandan malantaŭan ĉambron, kie ŝia tuta familio sidis, silente, kun la okuloj fiksitaj al rapide mortanta fajro. Tia aflikto, tia malespero estis la etoso de tiuj homoj kaj de ilia ĉambreto, ke mi deziras neniam ajn revidi similan scenon. 'Nenion ili gajnis, sinjoro', diris la virino, montrante al siaj knaboj, 'nenion dum 26 semajnoj, kaj nia tuta mono foriĝis, ĉiu dudek pundoj[181], kiun mi kaj la patro rezervis en la pli bonaj tempoj, pensante ke tio iom helpos nin kiam ni serĉas laboron. Rigardu', diris ŝi preskaŭ furioze, elprenante banklibron kun ĉiuj siaj regulaj atestoj pri enpagita kaj rezervita mono, tiel ke ni povis vidi, kiel la eta havaĵo komenciĝis per la unua depono de kvin ŝilingoj, kiel ĝi iom post iom kreskis ĝis dudek sterlingaj

179 Do, 5 x 36 = 180 litroj. -vl

180 Ĉi tie la aŭtoro aldonas la ekvivalenton en tiama germana mono (2 arĝentaj groŝoj kaj 6 pfenigoj) -vl

181 En la traduko de Markso: „ĉia mono". -vl

pundoj kaj poste ree kunfandiĝis, de pundoj s al ŝilingoj, ĝis kiam la lasta enskribo faris la libron same senvalora kiel malplena peco de papero. Tiu familio ricevis ĉiutage mizeran tagmanĝon de la azilo … Nia sekva vizito estis al la edzino de irlanda laboristo[182] laborinta ĉe la ŝipkonstruejoj. Ni trovis ŝin malsana pro manko de nutraĵoj, en ŝiaj vestaĵoj sternita sur matraco, apenaŭ kovrita per peco da tapiŝo, ĉar ĉiaj littukoj estis en la lombardejo. Du mizeraj infanoj flegis ŝin kaj ŝajnis siavice bezoni patrinan flegadon. Dek naŭ semajnoj da devigata nenifarado kondukis ilin al tiu situacio, kaj dum ŝi rakontis la historion de la amara pasinteco, ŝi ĝemis kvazaŭ ĉia espero je pli bona estonteco estus perdita … Ĉe nia eliro el la domo juna viro alkuris nin kaj petis nin iri en lian domon por vidi, ĉu io povus okazi favore al li. Juna edzino, du belaj infanoj, stako da lombardaj slipoj kaj tute malplena ĉambro estis ĉio, kion li povis montri.”

Pri la postaj sekvoj de la krizo de 1866 jena eltiraĵo el *Tory*-gazeto. Oni ne forgesu ke la orienta parto de Londono, pri kiu temas ĉi tie, estas ne nur la sidejo de la konstruejo de ferŝipoj, menciita en tiu ĉi ĉapitro, sed ankaŭ de tiel nomata „hejmlaboro” konstante pagata sub la minimumo.

„Horora spektaklo disvolviĝis hieraŭ en parto de la ĉefurbo. Kvankam la senlaboraj miloj de la orienta parto kun nigraj funebro-flagoj paradis ne amase, la homfluo estis sufiĉe impona. Ni memoru kion tiu loĝantaro suferas. Ĝi malsatmortas. Jen la simpla kaj terura fakto. Ili estas 40.000 … En nia ĉeesto, en kvartalo de tiu ĉi mirinda metropolo, tuj apud la plej eksterordinara akumulado de riĉaĵo, kiun la mondo iam ajn vidis, tuj apude 40.000 senhelpe malsatmortantaj! Tiuj miloj nun enrompiĝas en la aliajn kvartalojn; ili, en ĉiuj tempoj duone malsatmortantaj, kriegas al ni sian doloron en la orelojn, ili kriegas ĝin al la ĉielo, ili rakontas al ni pri siaj mizerigitaj loĝejoj, ke maleblas por ili trovi laboron kaj senutile almozpeti. La lokaj pagantoj de malriĉulimpostoj estas pro la postuloj de la pastrejoj mem kondukitaj al la rando de mizero.” (*Standard*, 5-a de aprilo 1867)

Ĉar inter la anglaj kapitalistoj estas modo priskribi Belgion kiel la paradizon de la laboristo, ĉar „la libereco de la laboro” aŭ, kio estas la samo, „la libereco de la kapitalo” tie ne kadukiĝis, nek per la despotismo de la sindikatoj nek per fabrikleĝoj, jen kelkaj vortoj pri la „feliĉo” de la belga laboristo. Certe neniu estis pli familiara kun la misteroj de tiu feliĉo ol la mortinta s-ro Ducpétiaux, ĝenerala inspektisto de la belgaj malliberejoj kaj karitataj institucioj kaj membro de la centra komisiono pri statistiko. Ni rigardu lian verkon: *Budgets économiques des classes ouvrières en Belgique* [Ekonomiaj buĝetoj de la laboristaj klasoj en

182 En la germana retversio: edzino de irlandano (*Frau eines Irländers*); same en la hispana eldono; en la angla retversio tamen: *iron labourer’s wife*. Evidente temas pri miskompreno aŭ mistajpado (*iron – irish* ?) -vl.

Belgio], Bruselo, 1855. Tie ni trovas i.a. normalan belgan laborist-familion, kies jaraj elspezoj kaj enspezoj estas kalkulitaj laŭ tre precizaj datumoj, kaj kies kondiĉoj de nutriĝo estis poste komparataj kun tiuj de soldato, de maristo kaj de malliberulo. La familio „konsistas el patro, patrino kaj kvar infanoj”. El tiuj ses personoj „kvar utile dungeblas dum la tuta jaro”; la premiso estas, „ke inter ili ne estas malsanuloj nek homoj nekapablaj labori” nek „elspezoj por religiaj, moralaj kaj intelektaj celoj, escepte de io tre malmulta por preĝejaj seĝoj”, nek „kotizoj al ŝparkasoj aŭ por provizado por maljunaĝo”, nek „elspezoj por lukso aŭ alie superfluaj elspezoj”. Tamen la patro kaj la plej aĝa filo rajtas fumi tabakon kaj dimanĉe viziti la gastejon, por kio oni kalkulas ne pli ol 86 centonojn.

> „El la kompleta konsisto de la salajroj por la laboristoj de la diversaj industribranĉoj sekvas … ke la plej alta mezumo de la ĉiutaga salajro estas: 1 franko 56 centonoj por viroj, 89 c. por virinoj, 56 c. por knaboj kaj 55 c. por knabinoj. Laŭ tio kalkuliĝas, ke la enspezoj de la familio estas maksimume 1.068 fr. jare … En la hejma mastrumado konsiderata kiel tipa, ni kunkalkulis ĉiajn eblajn enspezojn. Sed se ni enkalkulas salajron por la patrino, leviĝas la demando: kiu gvidas la mastrumadon; kiu prizorgas la domon, kiu la etajn infanojn? Kiu devas kuiri, lavi, fliki? Tiu dilemo aperas ĉiutage antaŭ la laboristo.”

La familia buĝeto estas laŭ tio:

| | | |
|---|---|---|
| la patro 300 labortagoj je | fr. 1,56 | fr. 468,- |
| la patrino | fr. 0,89 | fr. 267,- |
| la knabo | fr. 0,56 | fr. 169,- |
| la knabino | fr. 0,55 | fr. 165,- |
| | **Jara finsumo:** | **fr. 1.068,-** |

La jaraj elspezoj de la familio estus deficita kompare kun la enspezoj:

| | | |
|---|---|---|
| de la maristo | fr. 1.828,- | deficito: fr. 760,- |
| de la soldato | fr. 1.473,- | deficito: fr. 405,- |
| de la malliberulo | fr. 1.112,- | deficito: fr. 44,- |

> „Oni vidas, ke malmultaj laboristaj familioj povas akiri la nutraĵon, ne nur de la maristo aŭ de la soldato, sed eĉ de la malliberulo. Mezume ĉiu malliberulo kostis en Belgio de 1847 ĝis 1849 ĉiutage 63 c., kio estas diferenco de 13 c. kompare kun la ĉiutagaj vivtenaj kostoj de la laboristo. La kostoj por administrado kaj prigardado kompensiĝas per tio, ke la malliberulo ne pagas lupagon … Sed kiel okazas, ke granda nombro, ni povus diri: la granda plimulto de la

laboristoj, vivas ankoraŭ pli ŝpareme? Nur per tio ke ili elturniĝas per provizoraj anstataŭaĵoj, kies sekreton konas nur la laboristo mem; per tio ke ili ŝparas ĉe la taga porcio, manĝas sekalan panon anstataŭ tritikan, malmultan aŭ nenian viandon; same pri butero kaj spicaĵoj; per tio ke ili pakas la familion en unu aŭ du kamerojn, kie geknaboj kuŝas kune, ofte sur la sama pajlosako; per tio ke ili ŝparas je vestaĵo, je tolaĵo, je purigaj rimedoj; per tio ke ili rezignas dimanĉajn plezurojn, mallonge, per tio ke ili decidiĝas al plej doloraj malhavoj. Kiam ili alvenis ĉe tiu lasta limo, la plej eta prezaltiĝo de vivrimedoj, ia ajn paraliziĝo de la laboro, malsano, pliigas la mizeron de la laboristo kaj komplete ruinigas lin. La ŝuldoj amasiĝas, oni rifuzas al li krediton, la vestaĵoj, la plej necesaj mebloj iras en la lombardejon, kaj fine la familio petas pri enskribo en la liston de malriĉuloj."[183]

Efektive en tiu „paradizo de kapitalistoj" al la plej eta prezŝanĝo de la plej necesaj vivrimedoj sekvas ŝanĝo en la nombro de mortoj kaj krimoj![184] La tuta Belgio nombras 930.000 familiojn, el kiuj laŭ oficiala statistiko: 90.000 riĉuloj (elektantoj) = 450.000 personoj; 390.000 familioj de la malgranda meza klaso, en urbo aŭ vilaĝo, de kiu granda parto estas falanta en la proletaron = 1.950.000 personoj. Fine 450.000 laboristaj familioj = 2.250.000 personoj, el kiuj la modelaj familioj ĝuas la feliĉon priskribitan de Ducpétiaux. Inter la 450.000 laboristaj familioj 200.000 troviĝas en la listo de malriĉuloj!

183 Ducpétiaux, l.c., p. 151, 154, 155, 156.

184 Vidu „Manifesto de la Maatschappij: *De Vlamingen Vooruit!*", Bruselo, 1860, p. 12.

# DUDEKTRIA ĈAPITRO. PARTO III (SEKCIO 5.e kaj f) La ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado

## e) La brita terkultura proletaro

La antagonisma karaktero de la kapitalismaj produktado kaj akumulado montriĝas nenie pli brutale ol en la progreso de la angla terkulturo (inkluzive de bestbredado) kaj la malprogreso de la angla terkulturisto. Antaŭ ol mi transiros al lia nuna situacio, jen mallonga retrorigardo. La moderna terkulturo datas en Anglio de la mezo de la 18-a jarcento, kvankam la revolucio de la grundproprietaj kondiĉoj, de kiu la ŝanĝo de la produktadmaniero ekiras, okazis multe pli antaŭe.

Ni prenu la indikojn de Arthur Young, priciza observanto, kvankam supraĵa pensisto, pri la terkultura laboristo de 1771, kiu ludas tre mizeran rolon kompare kun lia antaŭulo ĉe la fino de la 14-a jarcento, „kie li povis vivi en abundeco kaj akumuli riĉaĵon”[185], por tute ne paroli pri la 15-a jarcento, „la ora epoko de la angla laboristo en urbo kaj kamparo”. Sed ni ne bezonas retroiri tiom malproksimen. En tre enhavoriĉa verko de 1777 legeblas:

> „La granda farmisto leviĝis preskaŭ al la nivelo de gentlemano, dum la malriĉa terlaboristo estas preskaŭ premata al la tero. Lia malfeliĉa situacio montriĝas klare per komparo de liaj kondiĉoj de hodiaŭ kaj de 40 jaroj antaŭe … Grundproprietulo kaj farmistoj agas man-en-mane por la subpremado de la laboristo.”[186]

Poste la teksto pruvas detale, ke la reala salajro en la kamparo falis de 1737 ĝis 1777 je preskaŭ kvarono aŭ 25 elcentoj.

> „La moderna politiko”, diras samtempe d-ro Richard Price, „favoras la pli altajn popolajn klasojn; la sekvo estos, ke pli aŭ malpli frue la tuta reĝlando

---

185 James E. Th. Rogers (profesoro pri politika ekonomio ĉe la universitato de Oksfordo): *A History of Agriculture and Prices in England*, Oksfordo, 1866, vol. 1, p. 690. Tiu diligente redaktita verko entenas en la ĝis nun aperintaj du unuaj volumoj nur la periodon de 1259 ĝis 1400. La dua volumo entenas nur statistikan materialon. Ĝi estas la unua aŭtenta historio de la prezoj, kiujn ni posedas por tiu periodo.

186 *Reasons for the late Increase of the Poor-Rates: or, a comparative view of the price of labour and provisions*, Londono, 1777, p. 5, 11.

konsistos nur el ĝentlemanoj kaj almozpetantoj, el aristokratoj kaj sklavoj."[187]

Tamen la situacio de la angla terkulturisto de 1770 ĝis 1780, koncerne liajn nutrad- kaj loĝ-kondiĉojn kiel ankaŭ lian memrespekton, liajn amuziĝojn ktp, estas idealo poste neniam plu atingita. Esprimita en kvanto de tritiko, lia mezuma salajro de 1770 ĝis 1771 estis 90 pindoj[188], en la tempo de Eden (1797) jam nur 65, sed en 1808 60.[189]

Ni jam indikis la situacion de la terkulturistoj fine de la kontraŭjakobena milito, dum kiu grundaristokratoj, farmistoj, fabrikistoj, komercistoj, bankistoj, borskavaliroj, armeliveristoj ktp tiel eksterordinare riĉigis sin. La nominala salajro kreskis, parte pro malplivaloriĝo de la bankbiletoj, parte – sendepende de tio – pro prezaltiĝo de la bazaj vivrimedoj. Sed la reala salajro-evoluo konstateblas tre simple, sen uzo de ĉi tie neallaseblaj detaloj. La malriĉul-leĝo kaj ĝia administrado estis en 1795 kaj en 1814 la samaj. Oni memoru, kiel tiu leĝo estis plenumata en la kamparo: en formo de almozoj la paroĥo kompletigis la nominalan salajron ĝis nominala sumo necesa por nura vegetado de la laboristo. La proporcio inter la salajro pagata de la farmisto kaj la salajra deficito kompensata de la paroĥo montras al ni du aferojn: unue la malaltigon de la salajro sub ĝian minimumon, due la gradon, en kiu la kamplaboristo konsistis el dunglaboristo kaj mizerulo, aŭ la gradon, en kiu oni transformis lin en servutulon de lia paroĥo. Ni elektu distrikton, kiu reprezentas la mezuman proporcion en ĉiuj aliaj distriktoj. 1795 la mezuma semajnslajro estis en *Northamtonshire* 7 ŝilingoj 6 pencoj, la jara ĉiomenspezo 29 pundoj 18 ŝ., la deficito kompensata de la paroĥo: 6 pundoj 14 ŝ. 5 pencoj. En la sama distrikto en la jaro 1814 la semajnsalajro estis 12 ŝ. 2 pencoj, la jara ĉiomelspezo de 5-persona familio 54 pundoj, 18 ŝilingoj, 4 pencoj, ĝia ĉiomenspezo 36 pundoj, 2 ŝilingoj, la deficito kompensata de la paroĥo: 18 pundoj, 6 ŝilingoj 4 pencoj[190], 1795 la deficito estis malpli ol kvarono

187 D-ro Richard Price: *Observations on Reversionary Payments*, 6-a eld. de W. Morgan, Londono, 1803, VII, p. 158, 159. Price rimarkigas en p. 159: „La nominala prezo por la laboro de taglaboristo estas en la momento ne pli ol kvar- aŭ maksimume kvin-oble pli alta ol en la jaro 1514. Sed la grenprezo estas sepoble, tiu por viando kaj vestaĵo proksimume dekkvinoble pli alta. La prezo de la laboro postrestis do tiom malantaŭ la kresko de la vivtenaj kostoj, ke ĝi nun en proporcio al tiuj kostoj ŝajnas esti eĉ ne la duono de tio, kion ĝi reprezentis antaŭe."

188 Mezuro de likvaĵo, en Britio 568 mililitroj. -vl

189 Barton, l.c., p. 26. Por la fino de la 18-a jarcento kp Eden, l.c.

190 Parry, l.c., p. 80.

de la salajro, 1814 pli ol la duono. Evidentas, ke sub tiuj cirkonstancoj la malmulta komforto, kiun Eden ankoraŭ trovis en la kabano de la kamp-laboristo, estis malaperinta en 1814.[191] Inter ĉiuj animaloj, kiujn la farmisto tenas, ekde tiam la laboristo, la *instrumentum vocale* [lingvoposeda instrumento], restis la plej laborigata, la malplej bone nutrata kaj la plej brutale traktata.

Tiu situacio trankvile daŭris, ĝis kiam

> „la *Swing*-ribeloj en 1830 malkaŝis al ni” (t.e. al la regantaj klasoj) „ĉe la lumo de flamantaj grengarbejoj, ke mizero kaj malhela ribela malkontento flamas same sovaĝe sub la surfaco de la terkultura kiel de la industria Anglio”.[192]

Sadler nomis tiam en la malsupra ĉambro de la parlamento la kamp-kulturistojn „blankaj sklavoj (*white slaves*), episkopo reeĥigis la epiteton en la supra ĉambro. La plej grava ekonomikisto de tiu periodo, E. G. Wakefield, diras:

> „La kampkulturisto de Sud-Anglio ne estas sklavo, li ne estas libera homo, li estas mizerulo.”[193]

La tempo ĵus antaŭ la nuligo de la grenleĝoj montris la situacion de la kamplaboristoj en nova lumo. Unuflanke la burĝaj agitantoj havis la intereson pruvi, kiom malmulte tiuj protekto-leĝoj protektis la verajn grenproduktistojn. Aliflanke la industria burĝaro ekŝaŭmis pro kolero pri la denuncado de la fabrik-situacio flanke de la grund-aristokratoj, pri la afektita simpatio de tiuj ĝisfunde koruptitaj, senkoraj kaj distingitaj nenifaruloj kun la suferoj de la fabriklaboristo kaj pri ilia „diplomatia fervoro” por la fabrikleĝoj. Estas malnova angla diro, ke, kiam du ŝtelistoj interkverelas, ĉiam okazas io utila. Kaj efektive, la brua, pasia kverelo inter la du frakcioj de la reganta klaso pri la demando, kiu el la du ekspluatas la laboriston plej senhonte, fariĝis dekstre kaj maldekstre akuŝisto de la vero. La grafo Shaftesbury, alinome Lord Ashley, estis antaŭbatalanto en la aristokrata kampanjo kontraŭ la fabrikfilantropio. Li fariĝis do, de 1844 ĝis 1845, la furora temo en la malkaŝoj de la gazeto *Morning Chronicle* pri la situacio de la kamplaboristoj. Tiu gazeto, tiutempe la plej grava liberala organo, sendis en la kamparajn distriktojn proprajn komisarojn, kiuj tute ne kontentiĝis per ĝenerala priskribo kaj statistiko, sed publikigis la nomojn de la esploritaj laboristaj familioj kaj ankaŭ tiujn de iliaj grundsinjoroj. La sekva listo montras salajrojn, pagit-

191 Saml., p. 213.

192 S. Laing, l.c., p. 62.

193 *England and America*, Londono, 1833, vol. I, p. 47.

ajn en tri vilaĝoj, en la najbareco de *Blanford*, *Wimbourne* kaj *Poole*. La vilaĝoj estas proprieto de s-ro G. Bankes kaj de la grafo de Shaftesbury. Oni rimarkos, ke tiu papo de la „malalta eklezio", tiu kapo de la anglaj pietistoj, same kiel la menciita Bankes, el la mizeraj salajroj de la laboristoj siavice enpoŝigis konsiderindan parton sub la preteksto de domrento.

a: nombro de infanoj

b: nombro de la familianoj

c: semajna salajro de la viroj

ĉ: semajna salajro de la infanoj

d: semajna enspezo de la tuta familio

e: semajna lupago por la domo

f: tuta semajna enspezo post depreno de la domluaĵo

g: pokapa semajna enspezo

**Unua vilaĝo**

| **a infa-noj** | **b fa-mili-ano j** | **c sala jro viro j** | **ĉ salajro infanoj** | **d enspezo familia** | **e lupago domo** | **f semajna familia salajro** | **g pokapa semajna enspezo** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj |
| 2 | 4 | 8 | -;- | 8;- | 2;- | 6;- | 1;6 |
| 3 | 5 | 8 | -;- | 8;- | 1;6 | 6;6 | 1;3$^{1}/_{3}$ |
| 2 | 4 | 8 | -;- | 8;- | 1;- | 7;- | 1;9 |
| 2 | 4 | 8 | -;- | 8;- | 1;- | 7;- | 1;9 |
| 6 | 8 | 7 | 1;0 - 1;6 | 10;6 | 2;0 | 8;6 | 1;$^{3}/_{4}$ |
| 3 | 5 | 7 | 1;0 - 2;- | 7;- | 1;4 | 5;8 | 1;1$^{1}/_{2}$ |

**Dua vilaĝo**

| **a infa-noj** | **b fa-mili-anoj** | **c salajro viroj** | **ĉ salajro infanoj** | **d enspezo familia** | **e lupago domo** | **f semajna familia salajro** | **g pokapa semajna enspezo** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj |
| 6 | 8 | 7 | 1;- - 1;6 | 10;- | 1;6 | 8;6 | 1;$^{3}/_{4}$ |
| 6 | 8 | 7 | 1;- - 1;6 | 7;- | 1;3$^{1}/_{2}$ | 5;8$^{1}/_{2}$ | 0;8$^{1}/_{2}$ |
| 8 | 10 | 7 | -;- | 7;- | 1;3$^{1}/_{2}$ | 5;8$^{1}/_{2}$ | 0;7 |
| 4 | 6 | 7 | -;- | 7;- | 1;6$^{1}/_{2}$ | 5;5$^{1}/_{2}$ | 0;11 |
| 3 | 5 | 7 | -;- | 7;- | 1;6$^{1}/_{2}$ | 5;5$^{1}/_{2}$ | 1;1 |

Tria vilaĝo

| **a infa-noj** | **b fa-mili-anoj** | **c salajro viroj** | **ĉ salajro infanoj** | **d enspezo familia** | **e lupago domo** | **f semajna familia salajro** | **g pokapa semajna enspezo** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj | ŝiling.; pencoj |
| 4 | 6 | 7 | – | 7;- | 1;- | 6;- | 1;- |
| 4 | 5 | 7 | 1;- – 2;- | 11;6 | 0;10 | 10;8 | 2;1$^{3}/_{5}$ |
| 0 | 2 | 5 | 1;- – 2;6 | 5;- | 1;- | 4; | 2;- |

Tabeloj laŭ *London Economist*, 29-a de marto 1845, p. 290.

La nuligo de la grenleĝoj donis al la angla kampkulturo gigantan

impulson. Plej grandskala drenado,[194] nova sistemo de enstala nutrado kaj kulturado de artefaritaj nutradherboj, enkonduko de meĥanikaj aparatoj por sterkado, nova pritraktado de argilaj grundoj, kreskanta uzado de mineralaj sterkaĵoj, aplikado de la vapormaŝino kaj de ĉiaj novaj labor-maŝinoj ktp, entute pli intensa kulturado karakterizas tiun epokon. La prezidanto de la reĝa societo pri kampkulturo, s-ro Pusey, asertas, ke la (relativaj) ekonomiaj kostoj preskaŭ duoniĝis pro la nove enkondukitaj maŝinoj. Aliflanke la pozitiva produktaĵo de la grundo kreskis rapide. Pli granda elspezo de kapitalo po akreo, do ankaŭ pli rapida koncentriĝo de la farmoj, estis baza kondiĉo de la nova metodo.[195] Samtempe la kulturata areo etendiĝis de 1846 ĝis 1856 je 464.119 akreoj, por ne paroli pri la grandaj surfacoj de la orientaj distriktoj, kiuj estis transformitaj el sovaĝaj kuniklejoj kaj malriĉaj paŝtejoj en abundajn grenkampojn. Ni jam menciis, ke samtempe la ĉioma nombro de personoj laborantaj en la kampkulturo malkreskis. Koncerne la kamplaboristojn en la propra senco, de ambaŭ seksoj kaj de ĉiuj aĝoj, ilia nombro malkreskis de 1.241.269 en la jaro 1851 al 1.163.217 en la jaro 1861.[196] Se la angla ĝenerala registristo do prave rimarkigas: „La pliiĝo de farmistoj kaj de terkulturistoj ekde 1801 estas en nenia proporcio kun la kresko de la agrikultura produkto”,[197] tiu misproporcio montriĝas ankoraŭ multe pli pri la lasta periodo, kie pozitivaj malkresko de la kampara laborist-loĝantaro iris man-en-mane kun la etendiĝo de la kulturataj areoj, de pli intensa kulturado, de senprecendenca akumulado de la kapitalo enigita en la grundon kaj dediĉitan al ties prilaborado, kresko de la grundprodukto sen paralelo en la historio de la angla kampkulturo, abundaj rentoj de la

194 La kampara aristokrataro provizis tiucele al si mem fonduson, kompreneble per la parlamento, el la ŝtata kaso je tre malalta interezo, kiun la farmistoj devis al ĝi duoble repagi.

195 La malpliiĝo de la mezaj farmistoj videblas ĉefe el la rubrikoj de la censo: „Farmista filo, nepo, frato, nevo, filino, nepino, fratino, nevino”, mallonge la membroj de lia propra familio, kiujn la farmisto laborigas. Tiuj rubrikoj nombris en 1851: 216.851 personojn, en 1861 nur 176.151. De 1851 ĝis 1871 la farmbienoj malpli grandaj ol 20 akreoj en Anglio malpliiĝis je pli ol 900; tiuj inter 50 kaj 75 akreoj falis de 8.253 al 6.370; simile statas pri ĉiuj ceteraj farmbienoj sub 100 akreoj. Male, dum la samaj 20 jaroj la nombro de la grandaj farmbienoj pliiĝis; tiuj de 300 – 500 akreoj kreskis de 7.771 al 8.410, tiuj de pli ol 500 akreoj de 2.755 al 3.914, tiuj de pli ol 1.000 akreoj de 492 al 582.

196 La nombro de ŝafpaŝtistoj kreskis de 12.517 al 25.559.

197 *Census* ktp, l.c., p. 36.

grundproprietuloj kaj ŝvelanta riĉaĵo de la kapitalismaj farmistoj. Se oni prenas ĉion ĉi kune kun la seninterrompa rapida evoluo de la urba debita merkato kaj de la regado de liberkomerco, tiam la kamplaboristo troviĝis, post tiom da ŝanĝoj de sia situacio, fine en situacio, kiu devis, laŭ ĉiuj reguloj de la arto, fari lin freneza pro feliĉo.

Profesoro Rogers venas, male, al la rezulto, ke la angla kamplaboristo nuntempe, por tute ne paroli pri lia antaŭulo en la lasta duono de la 14-a jarcento kaj en la 15-a jarcento, sed kompare nur kun sia antaŭulo el la periodo de 1770 ĝis 1780, troviĝas en eksterordinare pli malbona situacio, ke „li refariĝis servutulo", kaj pli precize malbone nutrata kaj malbone loĝigata servutulo.[198] D-ro Julian Hunter, en sia epokfara raporto pri la loĝkondiĉoj de la kamplaboristoj, diras:

> „La vivtenaj kostoj de la *hind*" (nomo el la epoko de servuto por la kamplaboristo) „estas fiksitaj je la kiom eble plej malalta sumo, per kiu li povas vivi … liaj salajro kaj loĝejo ne estas kalkulataj laŭ la profito akirebla de li. Li estas nulo en la kalkuloj de la farmisto.[199] Liaj rimedoj de vivtenado estas ĉiam traktataj kiel fiksa kvanto."[200] „Pri ia kroma reduktado de lia enspezo, li povas diri: mi havas neniom, mi zorgas neniom. Li ne timas la estontecon, ĉar li disponas pri nenio krom tio kio estas absolute nemalhavebla por lia ekzistado. Li atingis la punkton de nulo, el kiu la kalkuloj de la farmisto ekiras. Venu io ajn, li ne partoprenas en feliĉo aŭ malfeliĉo."[201]

En la jaro 1863 okazis oficiala esplorado pri la kondiĉoj de nutriĝo kaj dungiĝo de la krimuloj kondamnitaj al transportado kaj al publika trudlaboro. La rezultoj estas deponitaj en du dikaj blulibroj.

> „Zorgema komparo", legeblas interalie, „inter la dieto de la krimuloj en la malliberejoj de Anglio kaj de la malriĉulo en aziloj kaj de la liberaj kamplaboristoj samlandaj montras nedisputeble, ke la unuaj estas multe pli bone

---

198 Rogers, l.c., p. 693. „The peasant has again become a serf." saml., p. 10. S-ro Rogers apartenas al la liberala skolo, estas persona amiko de Cobden kaj Bright, do ne iu laŭdanto de pasintaj tempoj.

199 „*Public Health. Seventh Report*", Londono, 1865, p. 242. „Tile cost of the hind is fixed at the lowest possible amount on which he can live … the supplies of wages or shelter are not calculated on the profit to be derived from hin. He is a zero in farming calculations." Pro tio ne estas io eksterordinara, ke la domposedanto altigas la luprezon por laboristo, ekde kiam li aŭdas ke tiu gajnas iomete pli, aŭ de la farmisto malaltigas la salajron de la laboristo, „ĉar ties edzino trovis dungon". (saml.)

200 Saml., p. 135.

201 Saml., p. 134.

nutrataj ol iu ajn el la du aliaj klasoj"[202], dum „la laborkvanto postulata de kondamnito al publika trudlaboro estas proksimume la duono de tiu plenumata de la ordinara kamplaboristo."[203]

Jen kelkaj malmultaj eldiroj de atestantoj: John Smith, direktoro de la malliberejo en Edinburg, priaŭskultata.

N-ro 5056: „La dieto en la anglaj malliberejoj estas multe pli bona ol tiu de la ordinaraj kamplaboristoj." N-ro 5057: „Estas fakto, ke la ordinaraj kamplaboristoj de Skotlando ricevas tre malofte ian ajn viandon." N-ro 3047: „Ĉu vi konas ian ajn kaŭzon por la neceso nutri la krimulojn multe pli bone (*much better*) ol ordinarajn kamplaboristojn? – Certe ne." N-ro 3048: „Ĉu vi opinias taŭga fari pliajn eksperimentojn por proksimigi la dieton de la malliberuloj kondamnitaj al publikaj trudlaboroj al tiu, kiun oni donas al la liberaj taglaboristoj de la kampo?"[204]

El la tabeloj aneksitaj al la unua volumo de la raporto kunmetiĝis kompara superrigardo.

Semajna kvanto de nutraĵo[205]

| | Nitrogenenhavaj substancoj | Substancoj sen nitrogeno | mineralaj subst. | ĉioma sumo |
|---|---|---|---|---|
| | uncoj | uncoj | uncoj | uncoj |
| krimulo en la malliberejo de Portland | 28,95 | 150,06 | 4,68 | 183,69 |
| maristo en la reĝa ŝiparo | 29,63 | 152,91 | 4,52 | 187,06 |
| soldato | 25,55 | 114,49 | 3,94 | 143,98 |
| kaleŝfaristo (laboristo) | 24,53 | 162,06 | 4,23 | 190,82 |
| kompostisto | 21,24 | 100,83 | 3,12 | 125,19 |
| kamplaboristo[206] | 17,73 | 118,06 | 3,29 | 139,08 |

La ĝenerala rezulto de la kuracista esplorkomisiono de 1863 pri la nutriĝostato de la malbone nutrataj popolaj klasoj estas jam konata al la leganto. Li memoras, ke la dieto de granda parto de la kamplaboristaj

202 „*Report of the Commissioners … relating to Transportation and Penal Servitude*", Londono, 1863, p. 42, n-ro 50.

203 Saml., p. 77. „*Memorandum by the Lord Chief Justice*."

204 Saml., vol. I, *Appendix*, p. 280.

205 Saml., p. 274, 275.

206 Saml., p. 274 s.

familioj troviĝas sub la minimumo „por malhelpi malsat-malsanojn”. Tio estas la kazo ĉefe en la pure kampkulturaj distriktoj de *Cornwall, Devon, Somerset, Wilts, Stafford,* Oksfordo, *Berks* kaj *Herts*.

> „La nutraĵo, kiun la kamplaboristo ricevas”, diras d-ro Smith, „estas pli granda ol la mezuma kvanto montras, ĉar li mem ricevas multe pli grandan parton de la nutraĵoj, nepran por lia laboro, ol liaj ceteraj familianoj, en la pli malriĉaj distriktoj preskaŭ ĉiun viandon aŭ lardon. La kvanto de nutraĵo por la virino kaj same por la infanoj en ties periodo de rapida kresko, estas en multaj kazoj, en ĉiuj distriktoj, mankhava, ĉefe je nitrogeno.”[207]

La geservistoj loĝantaj ĉe la farmisto mem estas abunde nutrataj. Ilia nombro falis de 288.277 en la jaro 1851 al 204.962 en la jaro 1861.

> „La laboro de la virinoj sur libera kampo”, diras d-ro Smith, kvankam akompanata de aliaj malavantaĝoj, estas en la nunaj cirkonstancoj granda avantaĝo por la familio, ĉar ĝi liveras al ĝi la rimedojn por ŝuoj, vestaĵoj, pago de la domluo, kaj tiel kapabligas ĝin manĝi pli bone.”[208]

Unu el la plej notindaj rezultoj de tiu esplorado estis, ke la kamplaboristo en Anglio estas multe pli malbone nutrata ol en la ceteraj partoj de la Unuiĝinta Reĝlando (*„is considerably the worst fed”*), kiel la tabelo montras:

Semajna konsumo de karbono kaj de nitrogeno fare de la mezuma kamplaboristo[209]

---

207 *„Public Health. Sixth Report*, 1863”, p. 238, 249, 261, 262.

208 Saml., p. 262.

209 Saml., p. 17. La angla kamplaboristo ricevas nur kvaronon da lakto kaj nur kvinonon da panmaterialo kompare kun la irlanda. Ties pli bonan nutraĵstaton rimarkigis jam A. Young en sia „*Tour through Ireland*” komence de tiu ĉi jarcento. La kaŭzo estas simple tiu, ke la malriĉa irlanda farmisto estas senkompare pli humana ol la riĉa angla. Koncerne Kimrion, la teksta indiko ne validas por ĝia sudokcidento. „Ĉiuj tieaj kuracistoj samopinias, ke la pliiĝo de la mortokvoto pro ftizo, skrofolo ktp intensiĝas kun la malboniĝo de la korpa stato de la loĝantaro, kaj ĉiuj atribuas tiun malboniĝon al la malriĉeco. La ĉiutaga vivteno de la kamplaboristo estas taksata tie je 5 pencoj, en multaj distriktoj la farmisto” (mem malriĉa) „pagas malpli. Glutaĵo da salita viando, sekigita al malmoleco de mahagono kaj kiu apenaŭ valoras la penon de digesto, aŭ da lardo servas kiel spicaĵo de granda kvanto da buljono, da faruno kaj poreo, aŭ de avenkaĉo, kaj tagon post tago tiu estas la tagmanĝo de la kamplaboristo … La progreso de la industrio havis por li la sekvon, en tiu akra kaj malseka klimato, forlasi la solidan hejmŝpinitan tolaĵon por malmultekostaj kotonaj tolaĵoj kaj pli fortajn trinkaĵojn por ‘nominala’ teo … Post plurhora elmetiĝo al vento kaj pluvo la kamplaboristo revenas al sia kabano,

| | karbono granoj | nitrogeno granoj |
|---|---|---|
| Anglio | 46,673 | 1,594 |
| Kimrio | 48,354 | 2,031 |
| Skotlando | 48,980 | 2,348 |
| Irlando | 43,366 | 2,4341 |

„Ĉiu paĝo de la raporto de d-ro Hunter", diras d-ro Simon en sia oficiala sanraporto, „atestas pri la nesufiĉa kvanto kaj mizera kvalito de la loĝsituacio

---

por eksidi ĉe fajro el torfo aŭ el buloj kunmetitaj el argilo kaj karbrestaĵoj kaj kiuj elfumigas nubojn da karbonaj kaj sulfuraj acidoj. La muroj de la kabanoj konsistas el argilo kaj ŝtonoj, la planko el nuda tero, kiu estis tie antaŭ la konstruado de la kabano, la tegmento estas amaso da malfiksa kaj pufiĝinta pajlo. Ĉiu fendo estas ŝtopita por konservi la varmon,kaj en atmosfero de diabla fetoro, kun ŝlima planko sub si, ofte kun siaj solaj vestaĵoj sekiĝantaj sur sia korpo, li vespermanĝas kun edzino kaj infanoj. Akuŝistoj, devigitaj pasigi parton de nokto en tiuj kabanoj, priskribis, kiel iliaj piedoj ensinkis en la ŝlimon de la planko kaj kiel ili estis devigataj – facila laboro! – bori truon tra la muro por akiri por si etan privatan spiradon. Multnombraj diversrangaj atestantoj atestas, ke la subnutrata (*underfed*) kampkulturisto estas ĉiunokte elmetita al tiuj kaj aliaj malsanigaj influoj, kaj por la rezulto – malfortiĝinta kaj skrofolmalsana popolo – vere ne mankas pruvoj. … La informoj de la paroĥa oficisto de *Caermarthenshire* kaj de *Cardiganshire* frape montras la saman staton de la aferoj. Aldoniĝas ankoraŭ pli granda pesto, la disvastiĝo de idioteco. Krome la klimataj kondiĉoj. Akraj sudokcidentaj ventoj trablovas la tutan landon dum ok ĝis naŭ monatoj en la jaro, ilin sekvas pluvegoj, kiuj malŝarĝiĝas ĉefe sur la okcidentaj flankoj de la montetoj. Arboj maloftas, krom en ŝirmataj lokoj; kie ili estas ne ŝirmataj, ilia formo estas disblovata. La kabanoj rampas sub ian ajn montan terason, ofte ankaŭ en fendegon aŭ ŝtonrompejon, nur la plej etaj ŝafoj kaj endogena brutaro povas vivi sur la paŝtejoj … La junuloj elmigras al la orienta minejdistrikto de *Glamorgan* kaj *Monmouth* … *Caermarthenshire* estas la bredejo de la mineja loĝantaro kaj ĝia invalidejo … La loĝantaro nur pene konservas sian nombron. Tiel en *Cardinganshire*:

| | 1851 | 1861 |
|---|---|---|
| virseksaj | 45.155 | 44.446 |
| inseksaj | 52.459 | 52.955 |
| | 97.614 | 97.401 |

(Raporto de d-ro Hunter en „*Public Health. Seventh Report*, 1864", Londono, 1865, p. 498 ĝis 502 divl.)

de nia kamplaboristo. Kaj de multaj jaroj lia stato tiurilate pli kaj pli malboniĝis. Nun estas por li multe pli malfacile, trovi doman spacon, kaj, se trovita, ĝi estas multe malpli taŭga por liaj bezonoj ol eble antaŭ jarcentoj. Speciale ene de la lastaj 30 aŭ 20 jaroj la malbono rapide kreskis, kaj la loĝkondiĉoj de la kampulo estas nun plej lamentindaj. Escepte se tiuj, kiujn lia laboro riĉigas, opinias ke valoras la penon pritrakti lin kun ia kompata indulgo, li estas tute senhelpa en la afero. Ĉu li trovas loĝejon sur la kamparo, kiun li kulturas, ĉu ĝi estas homa aŭ porka, ĉu kun ĝardeneto, kiu tiom malpezigas la premon de la malriĉeco, ĉio ĉi dependas ne de lia preteco aŭ kapablo pagi justan luprezon, sed de la uzado, kiun aliaj faras per ‘la rajto uzi sian proprieton laŭplaĉe’. Kiom ajn granda la farmbieno estas, ne ekzistas leĝo ke sur ĝi devas esti certa nombro de laboristaj loĝejoj, kaj eĉ decaj; same la leĝo rezervas al la laboristo eĉ ne le plej etan rajton je la grundo, por kiu lia laboro estas tiom necesa kiom pluvo kaj sunbrilo … Konata cirkonstanco ĵetas ankoraŭ pezan pezilon en la pesilon kontraŭ li …, la influon de la malriĉul-leĝo kun ĝiaj dispozicioj pri loĝloko de malriĉuloj kaj pri ŝarĝoj de la paroĥoj koncerne la malriĉul-imposton.[210] Sub ĝia influo ĉiu paroĥo havas monintereson limigi la nombron de siaj en ĝi loĝantaj kamplaboristoj al minimumo; ĉar malfeliĉe la kamplaboro, anstataŭ garantii sekuran kaj konstantan sendependecon al la akre laboranta laboristo kaj al lia familio, ĝi kondukas plej ofte sur pli aŭ malpli longa ĉirkaŭvojo al la mizero, al mizero kiu estas dum la tuta vojo tiom proksima, ke ĉia malsano aŭ ia ajn preterpasa manko je dungo rekte devigas rifuĝi al la paroĥo; kaj pro tio ĉia loĝado de kamplaborista loĝantaro en paroĥo estas evidente ia kromaĵo al ties malriĉul-imposto … Grandaj grundproprietuloj[211] bezonas nur decidi, ke neniuj laboristaj loĝejoj staru sur iliaj bienoj, kaj ili tuj liberiĝas el la duono de sia respondeco por la malriĉuloj. Kiom la angla konstitucio kaj la leĝo intencis tiun specon de senkondiĉa grundproprieto, kiu kapabligas la mastron pritrakti la kulturantojn de la grundo kiel fremdulojn kaj forpeli ilin el sia teritorio, estas demando kiun mi ne pretendas diskuti … Tiu povo evikcii ne estas nura teorio. Ĝi realiĝas praktike plej grandskale. Ĝi estas unu el la cirkonstancoj kiuj regas la loĝkondiĉojn de la kamplaboristo … La amplekson de tiu malbonaĵo oni povas prijuĝi laŭ la lasta censo, laŭ kiu la detruado de domoj, spite al pli granda loka postulo je ili, dum la lastaj dek jaroj, estis daŭrigata en 821 diversaj distriktoj de Anglio, tiel ke, senkonsidere la personojn devigatajn fariĝi neloĝantoj,” (nome en la paroĥo en kiu ili laboras) „en 1861 kompare kun 1851 loĝantaro pli granda je 5$^{1}/_{3}$ % estis devigata loĝi en 4$^{1}/_{2}$ % malpli grandan domspacon … Ekde kiam la senpopol-

210 En la jaro 1865 tiu leĝo estis iometa plibonigita. Oni baldaŭ lernos el la sperto, ke tia fuŝaĵo neniom helpas.

211 Por kompreni la sekvon: *Close villages* (fermitaj vilaĝoj) nomiĝas tiuj, kies grundproprietulo estas unu aŭ kelkaj grandaj kamparaj nobeloj; *Open Villages* (malfermitaj vilaĝoj) tiuj, kies grundo apartenas al multaj pli malgrandaj proprietuloj. Tiuj lastaj estas lokoj, kie konstru-spekulistoj povas starigi kabanojn kaj domojn por ŝanĝiĝantaj loĝantoj.

iga procezo atingis sian celon, la rezulto estas, diras d-ro Hunter, montrovilaĝo (*show-village*), kie la kabanoj estas reduktitaj al malmultaj kaj kie neniu rajtas vivi krom ŝafistoj, ĝardenistoj kaj ĉasgardistoj, regulaj servistoj, kiuj ricevas la por sia klaso kutime bonan traktadon de siaj mastroj.[212] Sed la grundo bezonas kulturadon, kaj oni vidas, ke la por ĝi dungitaj laboristoj ne loĝas sur la grundo de la grundproprietulo, sed venas el malfermita vilaĝo, malproksima je eble tri mejloj, kie ili estas akceptitaj post la detruo de iliaj kabanoj. Tie, kie tiu detruado prepariĝas, la mizera aspekto de la kabanoj ne lasas dubon pri la sorto al kiu ili estas kondamnitaj. Oni trovas ilin sur la diversaj ŝtupoj de natura kadukiĝo. Tiom longe, kiom la konstruaĵo ne disfalas, oni permesas al la laboristo pagi luprezon por ĝi, kaj li estas ofte tre feliĉa rajti tion, eĉ se li devas pagi la prezon por bona loĝejo. Sed neniam ia ajn riparo, krom tiun kiun la senhava loĝanto povas fari mem. Kiam ĝi fine fariĝas tute neloĝebla, tiam ĝi estas unu detruita kabano pli kaj je tiom da malriĉul-imposto malpli. Dum la grandaj proprietuloj tiel senigas sin je la malriĉul-imposto, per senpopoligo de la grundo kiun ili regas, la plej proksima urbeto aŭ malfermita vilaĝo akceptas la elpelitajn laboristojn; la plej proksima, diras mi, sed tiu 'plej proksima' povas esti tri aŭ kvar mejlojn for de la farmbieno, kie la laboristo devas ĉiutage liveri sian laboron. Tiel oni aldonas al lia taglaboro, kvazaŭ tio estus nenio, la neceson de ĉiutaga marŝo de ses aŭ ok mejloj por perlabori sian ĉiutagan panon. Ĉia kamplaboro, kiun faras lia edzino kaj liaj infanoj okazas nun sub la samaj pli malfacilaj cirkonstancoj. Kaj tio ankoraŭ ne estas la tuta malbono, kiun la malproksimeco kaŭzas al li. En la malfermita vilaĝo konstruspekulisto aĉetas terpecojn, kiujn li prisemas kiom eble plej dense per la plej malmultekostaj el ĉiaj eblaj kabanaĉoj. Kaj en tiuj mizeraj loĝejoj, kiuj, eĉ se ili limas kun la malfermita pejzaĝo, dividas kun la plej malbonaj urbaj loĝejoj la plej monstrajn trajtojn, sidas la kamplaboristoj de Anglio.[213] Aliflanke oni ne iluziu, ke eĉ

---

212 Tia montrovilaĝo aspektas tre plaĉe, sed ĝi estas tiom malreala kiel la vilaĝoj, kiujn Katarino la 2-a vidis dum sia vojaĝo al Krimeo. Lastatempe ankaŭ la ŝafisto estas ofte forigata el tiuj montrovilaĝoj. Ekz-e ĉe *Market Harborough* estas ŝafejo de proksimume kvincent akreoj, kiu bezonas la laboron de nur unu sola homo. Por ŝpari al li la longajn marŝojn tra tiuj vastaj surfacoj, la belaj paŝtejoj de *Leicester* kaj *Northampton*, la paŝtisto kutime ricevis kabanon sur la farmbieno. Nun oni donas al li dektrionan ŝilingon por loĝado, kiun li devas serĉi malproksime en la malfermita vilaĝo.

213 „La domoj de la laboristoj" (en la malfermitaj vilaĝoj, kiuj estas kompreneble ĉiam superplenaj) „estas kutime konstruitaj laŭvice, kun la dorso sur la plej ekstrema eĝo de la terpeco, kiun la konstruspekulisto nomas sia. Pro tio ili estas sen aliro de lumo kaj aero krom el la fronta flanko." (Raporto de d-ro Hunter, l.c., p. 135) „Tre ofte la estro de la biergastejo aŭ la komercisto de la vilaĝo estas samtempe domluisto. Tiukaze la kamplaboristo trovas en li duan mastron apud la farmisto. Li devas samtempe esti lia kliento. Per dek ŝilingoj semajne, minus jara rento de 4 pundoj, li estas devigata aĉeti de li sian mal-

tiu laboristo, kiu loĝas sur la grundo kiun li prilaboras, havas loĝejon kiun lia produktiva vivo meritas. Eĉ sur la plej princaj bienoj lia kabano estas ofte plej mizera. Ekzistas mastroj, kiuj kredas stalon sufiĉe bona por siaj laboristoj kaj por ties familioj kaj tamen ne hontas elpremi kiom eble plej el la luado.[214] Tio povas esti nur kaduka kabano kun unu dormĉambro, sen necesejo, sen malfermeblaj fenenstroj, sen akvoprovizo krom la fosaĵo, sen ĝardeno, kaj la laboristo estas senpova kontraŭ la maljustaĵo. … Krome, niaj sanpolicaj leĝoj (la *Nuisances Removal Acts*) estas mortaj literoj. Ilia plenumado estas konfidata ĝuste al la proprietuloj, kiuj luas tiajn truojn … Oni ne blindiĝu per esceptokaze pli helaj scenoj pri la grandega plimulto de la faktoj kiuj estas honto por la angla civilizacio. La situacio devas esti vere abomeninda, se, malgraŭ la evidenta monstreco de la nunaj loĝejoj, kompetentaj observantoj unuanime konkludas, ke eĉ la ĝenerala malboneco de la loĝejoj estas senfine malpli prema malbono ol ilia nombra malsufiĉo. De jaroj ne nur personoj, kiuj atentas pri sano, sed ĉiuj, kiuj atentas pri deca kaj morala vivo, ĉagreniĝis pro la trolоĝateco de la loĝejoj de kamplaboristoj. Ĉar, ree kaj ree, en esprimoj tiom samaj ke ili ŝajnas kliŝaj, la raportistoj denuncas la troloĝatecon de la domoj kiel kaŭzon de la disvastiĝo de epidemiaj malsanoj en la kamparaj

---

multon da teo, sukero, faruno, sapo, kandeloj kaj biero je la prezo kaj la kondiĉoj de la komercisto.” (saml., p. 132) Tiuj malfermitaj vilaĝoj konsistigas efektive la „punkoloniojn” de la angla kampkultura proletaro. Multaj el tiuj kabanoj estas provizoraj loĝejoj, kie trapasas ĉiuj vagabondoj de la ĉirkaŭaĵo. La kampulo kaj lia familio, kiuj ofte kvazaŭ mirakle konservis en la plej malpuraj kondiĉoj sian bravecon kaj la purecon de sia karaktero, iras ĉi tie simple al la diablo. Kompreneble estas modo inter la aristokrataj *Shylocks* hipokrite levi la ŝultrojn pri la konstruspekulistoj kaj la etproprietuloj kaj la malfermitaj vilaĝoj. Ili scias tre bone, ke iliaj „fermitaj vilaĝoj kaj montrovilaĝoj” estas la naskejoj de la „malfermitaj vilaĝoj” kaj ne povus ekzisti sen tiuj. „Sen la etproprietuloj de la malfermitaj vilaĝoj la plej granda parto de la kamplaboristoj devus dormi sub la arboj de la bienoj, sur kiuj ili laboras.” (saml., p. 135) La sistemo de la „malfermitaj” kaj „fermitaj” vilaĝoj regas en ĉiuj distriktoj de centra Anglio kaj en la tuta oriento de Anglio.

214 „La domluisto” (la farmisto aŭ la grundproprietulo) „riĉigas sin rekte aŭ malrekte per la laboro de viro dungita je 10 ŝilingoj semajne, kaj poste prenas de tiu kompatindulo 4 aŭ 5 pundojn jare kiel luprezon por domoj, kiuj en vere libera merkato ne valorus 20 pundojn, sed kies artefarita prezo konserviĝas per la povo de la proprietulo diri: ‘Prenu mian domon aŭ foriru serĉi tegmenton aliloke, sen laboratesto subskribita de mi’ … Se iu deziras plibonigi sian situacion, ekz-e iri kiel relmetisto ĉe la fervojo aŭ eklabori en ŝtonrompejo, tiam la sama povo pretas diri: ‘Laboru por mi je tiu malalta salajro aŭ foriru kaj vidu kiom vi ricevos per la terpomoj kiuj kresks en via ĝardeno.’ Sed se lia intereso estas labori aliloke, tiam la posedanto” (nome farmisto) „kelkfoje preferas altigi la luprezon, kiel puno pro la dizertiĝo el lia servo.” (D-ro Hunter, saml., 132)

distriktoj, kiel kaŭzon kiu vanigas ĉian provon haltigi la progreson de aperinta epidemio. Kaj ree kaj ree estis pruvite, ke spite al la multaj sanfavoraj influoj de kampara vivo la trologateco, kiu tiom rapidigas la disvastiĝon de kontaĝaj malsanoj, favoras ankaŭ la estiĝon de nekontaĝaj malsanoj. Kaj la personoj, kiuj denuncis tiun situacion, ne silentas pri kroma malbono. Eĉ tie, kie ilia origina temo koncernis nur la sanprizorgadon, ili estis preskaŭ devigataj pritrakti la aliajn flankojn de la temo. Pruvante la multegajn okazojn, kie plenkreskuloj de ambaŭ seksoj, ĉu geedzoj aŭ ne, estas kunmiksitaj (*huddled*) en mallarĝaj dormĉambroj, iliaj raportoj devis estigi la konvinkon, ke sub la priskribitaj cirkonstancoj la honto- kaj deco-sento estas plej krude ofendata kaj ĉia moraleco preskaŭ nepre ruinigata.[215] Ekz-e en la aldono de mia lasta raporto d-ro Ord mencias en sia raporto pri la okazo de febro kiu furoris en *Wing* en *Buckinghamshire*, kiel junulo el *Wingrave* venis tien kun febro. En la unuaj tagoj de sia malsano li dormis kun 9 aliaj personoj kune en la sama ĉambro. En du semajnoj la malsano kaptis diversajn personojn, ene de malmultaj semajnoj 5 el la 9 personoj malsaniĝis je la febro, kaj unu mortis! Samtempe d-ro Harvey de la malsanulejo *St. Georges*, kiu vizitis *Wing* en la epidemia tempo pro privataj profesiaj aferoj, raportis al mi, en la sama senco: ‘Febromalsana junulino kuŝis nokte en la sama ĉambro kiel ŝia patro, ŝia patrino, ŝia neleĝa infano, du junuloj, ŝiaj fratoj, kaj ŝiaj du fratinoj ĉiu kun neleĝa infano, entute dek personoj. Kelkajn semajnojn antaŭe dek tri infanoj dormis en tiu sama ĉambro.’”[216]

D-ro Hunter esploris 5.375 kamplaboristajn kabanojn, ne nur en la pure kampkulturaj distriktoj, sed en ĉiuj distriktoj de Anglio. Inter tiuj 5.375 nur 2.195 havis dormĉambron (ofte samtempe loĝĉambro), 2.930 nur du kaj 250 pli ol du. Mi donu por dekduo da distriktoj mallongajn ekzemplojn.

215„Jungeedzoj ne estas edifa studobjekto por plenkreskaj fratoj kaj fratinoj en la sama dormĉambro; kaj kvankam oni ne rajtas registri ekzemplojn, ekzistas sufiĉe multaj datumoj por pravigi la rimarkigon, ke granda aflikto kaj ofte la morto estas la sorto de la inaj partoprenintoj en la krimo de incesto.” (D-ro Hunter, saml., 137) Kampara policisto, kiu funkciis dum multaj jaroj kiel detektivo en la plej malbonaj kvartaloj de Londono, diras pri la knabinoj de sia vilaĝo: „Ilian krudan malmoralecon en frua aĝo, ilian impertinenton kaj senhontecon mi neniam vidis atingita dum mia policista vivo en la plej malbonaj partoj de Londono … Ili vivas kiel porkoj, grandaj knaboj kaj knabinoj, patrinoj kaj patroj, ĉio dormas kune en la sama ĉambro.” („*Child. Empl. Com. Sixth Report, 1867, Appendix*”, p. 77, n. 155)

216„*Public Health. Seventh Report, 1864*”, p. 9-14 divl.

# 1. *Bedfordshire*

*Wrestlingworth*: dormĉambro proksimume 12 futojn longa kaj 10 larĝa, kvankam multaj estas pli malgrandaj. La malgranda unuetaĝa kabano estas ofte dividita en du dormĉambrojn, ofte lito en kuirejo 5 futojn 6 colojn alta. Luprezo 3 sterlingaj pundoj. La luantoj devas konstrui siajn proprajn necesejojn, la domproprietulo liveras nur truon. Kiam iu konstruas necesejon, tiu estas uzata de ĉiuj najbaroj. Domo apartenanta al familio nomata Richardson, estis de tute neriproĉebla beleco. „Ĝiaj morteraj muroj pufiĝis kvazaŭ robo de sinjorino dum klinsaluto. Unu frontono estis konveksa, la alia konkava, kaj sur la lasta staris malbonŝance kamentubo, kurbita tubo el argilo kaj ligno kvazaŭ elefanta rostro. Longa bastono servis kiel apogilo, por malebligi la falon de la kamentubo. Pordo kaj fenestro estis en formo de rombo." El 17 vizititaj domoj estis nur kvar kun pli ol unu dormĉambro, kaj tiuj kvar troloĝataj. La unuĉambraj kabanoj gastigis jen tri plenkreskulojn kaj tri infanojn, jen geedzan paron kun ses infanoj, ktp.

*Dunton*: Altaj luprezoj, de kvar ĝis kvin pundoj jare, semajna salajro de viroj 10 ŝilingoj. Ili esperas, per pajloplektado de la familio perlabori la lupagon. Ses plenkreskuloj, kun 4 infanoj en unu dormĉambro, pagas por tio 3 pundojn 10 ŝilingojn. La plej malmultekosta domo en Dunton, kun eksteraj mezuroj de 15 futojn longa, 10 larĝa, luata por 3 pundoj. Nur unu el kvar esploritaj domoj havis du dormĉambrojn. Iom antaŭ la vilaĝo domo, prifekita de la enloĝantoj antaŭ siaj eksteraj muroj, la subaj 9 coloj de la pordo malaperinta pro pura putrado; ĉe la fermo vespere, kelkaj brikoj de interne antaŭŝovitaj kaj per iom da pendigita mato fermita. Duona fenestro, kune kun vitro kaj kadro, jam ne ekzistis. Tie, sen mebloj, estis kunpremitaj 3 plenkreskuloj kaj 5 infanoj. *Dunton* ne estas pli malbona ol la resto de la *Biggleswade*-Unio.

# 2. *Berkshire*

*Beenham*: En junio 1864 viro, virino, 4 infanoj vivis en *cot* (unuetaĝa kabano). Filino venis hejmen el la servo kun skarlatino. Ŝi mortis. Unu infano malsaniĝis kaj mortis. La patrino kaj unu infano suferis je tifo, kiam d-ro Hunter estis vokita. La patro kaj unu infano dormis ekstere, sed la malfacilo certigi izoladon, montriĝis tie, ĉar en la plenŝtopita bazaro de la mizera vilaĝo kuŝis la lavota tolaĵo de la domo frapita de tiu febro. La luprezo de la domo de H., 1 ŝ. semajne; unu dormĉambro por edzo,

edzino kaj 6 infanoj. Iu domo luita por 8 pencoj semajne, 14 futojn 6 colojn longa, 7 futojn larĝa, kun kuirejo 6 futojn alta; la dormĉambro sen fenestro, sen fajrejo, sen pordo nek malfermaĵo escepte por la koridoro, nenia ĝardeno. Antaŭ mallonge loĝis tie viro kun du plenkreskaj filinoj kaj unu adoleska filo; la patro kaj la filo dormis en la lito, la knabinoj en la koridoro. Dum la familio loĝis tie, ĉiu filino havis infanon, sed unu iris al la *workhouse* por sia nasko kaj poste revenis hejmen.

## 3. *Buckinghamshire*

30 kabanoj – sur 1.000 akreoj da tereno – entenas ĉi tie proksimume 130 ĝis 140 personojn. La paroĥo de *Badenham* ampleksas je 1.000 akreoj; ĝi havis en 1851 36 domojn kaj loĝantaron de 84 viraj kaj 54 inaj personoj. Tiu seksa malegaleco pliboniĝis en 1861, kiam ĝi nombris 98 virajn kaj 87 inajn personoj, kresko en 10 jaroj de 14 viroj kaj de 33 virinoj. Sed la nombro de domoj malpliiĝis je 1.

*Winslow*: Granda parto de ĝi novkonstruita en bona stilo; postulo je domoj ŝajnas konsiderinda, ĉar tre mizeraj *cots* luitaj je 1 ŝ kaj 1 ŝ 3 pencoj semajne.

*Water Eaton:* Ĉi tie la proprietuloj vide al kreskanta loĝantaro detruis proksimume 20 elcentojn de la ekzistantaj domoj. Malriĉa laboristo, kiu devis iri proksimume kvar mejlojn al sia fabriko, respondis al la demando, ĉu li ne povas trovi iun *Cot* pli proksime: *„Ne, ili diable gardos sin akcepti viron kun mia granda familio."*

*Thinker's End*, ĉe *Winslow*: Dormĉambro, en kiu kvar plenkreskuloj kaj kvin infanoj, 11 futojn longa, 9 futojn larĝa, 6 futojn 5 colojn alta ĉe la plej alta punkto; alia, 11 futojn 7 colojn longa, 9 futojn larĝa, 5 futojn 10 colojn alta, gastigis ses personojn. Ĉiu el tiuj familioj disponis pri malpli da spaco ol galerulo. Neniu domo havis pli ol unu dormĉambron, neniu malantaŭan pordon. Akvo tre malofta. Semajna luprezo de 1 ŝ. 4 d. ĝis 2 ŝ. En 16 kontrolitaj domoj nur unu sola viro kiu perlaboras 10 ŝilingojn semajne. La aerprovizo de ĉiu persono en la menciita kazo egalas al tiu, kiun li havus, se dumnokte enfermita en skatolo de 4 kubikfutoj. Tamen la malnovaj kabanoj donas abunde naturan aerumadon.

## 4. *Cambridgeshire*

*Gamblingay* apartenas al diversaj proprietuloj. Ĝi enhavas la plej mizerajn *Cots* ie ajn troveblajn. Multa pajloplektado. Mortiga laceco, malespera rezigniĝo en malpuraĵo regas en *Gamblingay*. La neglekto en ĝia centro fariĝas torturo ĉe la ekstremaĵoj, norde kaj sude, kie la domoj popece forputras. La forestantaj luigantoj tro libere elsangigas tiun kompatindan nestaĉon. La luprezoj estas tre altaj; 8 ĝis 9 personoj enpakitaj en unu unulita dormĉambro, en du kazoj ses plenkreskuloj kun po unu kaj du infanoj en malgranda dormĉambro.

## 5. *Essex*

En tiu distrikto, malpliiĝo de personoj kaj de kabanoj iras en multaj paroĥoj man-en-mane. En ne malpli ol 22 paroĥoj tamen la domdetruado ne haltigis la kreskon de loĝantaro aŭ ne sekvigis la elpelon, kiu sub la nomo „migrado al la urboj” ĉie okazas. En *Fingringhoe*, paroĥo de 3.443 akreoj, staris en 1851 145 domoj, en 1861 jam nur 110, sed la popolo ne volis foriri kaj sukcesis eĉ kreski en tiuj cirkonstancoj. En *Ramsden Crays* 252 personoj loĝis en 1851 en 61 domoj, sed en 1861 262 personoj estis premitaj en 35 domoj. En *Basildon* vivis 1851 sur 1.827 akreoj 157 personoj en 35 domoj, fine de la jardeko 180 personoj en 27 domoj. En la paroĥoj de *Fingringhoe*, *South Fambridge*, *Widford*, *Basildon* kaj *Ramsden Crays* vivis 1851 sur 8.449 akreoj 1.392 personoj en 316 domoj, en 1861 sur la sama areo 1.473 personoj en 249 domoj.

## 6. *Herefordshire*

Tiu malgranda distrikto suferis pli pro la „evikcia spirito” ol ia ajn alia en Anglio. En *Madley* la superplenaj kabanoj, plej ofte kun du dormĉambroj, apartenas plejparte al la farmistoj. Ili luas ilin facile je 3 aŭ 4 pundoj jare kaj pagas semajnsalajron de 9 ŝilingoj!

## 7. *Huntingdonshire*

*Hartford* havis en 1851 87 domojn, mallonge poste 19 kabanoj detruitaj en tiu malgranda paroĥo de 1.720 akreoj; loĝantaro 1831: 452 personoj, 1851: 382 kaj 1861: 341. Dek kvar unulitajn *cots* esplorinta. En unu 1

geedza paro, 3 plenkreskaj filoj, unu plenkreska knabino, kvar infanoj, entute dek; en alia tri plenkreskuloj, ses infanoj. Unu el tiuj ĉambroj, en kiuj dormis 8 personoj, estis 12 futojn 10 colojn longa, 12 futojn 2 colojn larĝa, 6 futojn 9 colojn alta; mezuma mezuro, sen dekalkulo de elstaraĵoj, estis proksimume po 130 kubikfutoj por ĉiu persono. En la 14 dorm-ĉambroj: 34 plenkreskuloj kaj 33 infanoj. Tiuj kabanoj havas malofte ĝardeneton, sed multaj el la domanoj povis lupreni etajn pecetojn da grundo, po 10 aŭ 12 ŝilingoj por kvarona akreo. Tiuj terpecetoj estas malproksimaj de la domoj sen necesejoj. La familio devas aŭ iri al sia parcelo por demeti siajn ekskrementojn, aŭ, kiel okazas ĉi tie, por respek-toplene raporti tion, plenigi per ĝi tirkeston de la ŝranko. Ekde kiam tiu estas plena, oni eltiras ĝin kaj malplenigas ĝin tie, kie ĝia enhavo estas necesa. En Japanio la cirkulado de la vivkondiĉoj okazas pli pure.

## 8. *Lincolnshire*

*Langtoft*: Ĉi tie viro loĝas en la domo de Wright kun sia edzino, ties patrino kaj kvin infanoj; la domo havas antaŭan kuirejon, lavkameron, dormĉambron super la antaŭa kuirejo; antaŭa kuirejo kaj dormĉambro 12 futojn 2 colojn longa, 9 futojn 5 colojn larĝa, la tuta surfaco 21 futojn 3 colojn longa, 9 futojn 5 colojn larĝa. La dormĉambro estas subtegment-ejo. La vandoj kuniĝas pinte ĉe la plafono, kaj klapfenestro malfermiĝas ĉe la antaŭa flanko. Kial li loĝas ĉi tie? Ĉu ĝardeno? Eksterordinare eta. Luprezo? Alta, 1 ŝ. 3 d. semajne. Ĉu proksima de la laboro? Ne, ses mejlojn for, tiel ke li marŝas ĉiutage 12 mejlojn alen kaj reen. Li loĝas tie, ĉar tio estis luebla *cot* kaj ĉar li volis havi iun *cot* por si sola, ie, je ia ajn prezo, en ia ajn stato. Jen la statistiko de 12 domoj en *Langtoft* kun 12 dormĉambroj, 38 plenkreskuloj kaj 36 infanoj:

*12 domoj en Langtoft*

| domo n-ro | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| dormĉamroj | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 | 1 |
| plenkresk-uloj | 3 | 4 | 4 | 5 | 2 | 5 | 3 | 3 | 2 | 2 | 3 | 2 |
| infanoj | 5 | 3 | 4 | 4 | 2 | 3 | 3 | 2 | 0 | 3 | 3 | 4 |
| nombro de pers. | 8 | 7 | 8 | 9 | 4 | 8 | 6 | 5 | 2 | 5 | 6 | 6 |

## 9. *Kent*

*Kennington*, tre serioze superloĝata en 1859, kiam difterio aperis kaj la paroĥa kuracisto aranĝis oficialan enketon pri la situacio de la pli malriĉa klaso de la popolo. Li eltrovis, ke en tiu vilaĝo, kie necesas multa laboro, diversaj *cots* estis detruitaj kaj neniu nova konstruita. En unu distrikto staris kvar domoj, nomataj birdokaĝoj; ĉiu havis kvar ĉambrojn kun la sekvaj dimensioj en futo kaj colo:

| | |
|---|---|
| kuirejo | 9,5 x 8,11 x 6,6 |
| lavkamero | 8,6 x 4,60 x 6,6 |
| dormĉambro | 8,5 x 5,10 x 6,3 |
| dormĉambro | 8,3 x 8,40 x 6,3 |

## 10. *Northamptonshire*

*Brixworth, Pitsford* kaj *Floore*: En tiuj vilaĝoj dumvintre 20 ĝis 30 viroj pro manko de laboro vagadas sur la stratoj. La farmistoj ne ĉiam kulturas la grundon je greno kaj radikoj, kaj la luisto havis la ideon kunmeti ĉiujn siajn farmejojn en du aŭ tri. Pro tio, manko je dungo. Dum unuflanke de la fosaĵo la kampo kriegas je laboro, la trompitaj laboristoj ĉe la alia flanko rigardas ĝin sopire. Febre tro laborantaj somere kaj duone malsatmortaj vintre, ne mirigas ke ili diras en sia propra dialekto, ke „ŝajnas ke pastro kaj nobelo konspiris por peli ilin al morto”[217]

En *Floore* ekzemploj de paroj kun 4, 5, 6 infanoj en unu dormĉambro de plej eta eldono, same 3 plenkreskuloj kun 5 infanoj, same paro kun avo kaj 6 skarlatin-malsanaj infanoj ktp; en du domoj kun du dormĉambroj du familioj de po ok kaj 9 plenkreskuloj.

## 11. *Wiltshire*

*Stratton*: vizitinta 31 domojn, 8 kun nur unu dormĉambro; *Penhill* en la sama paroĥo. Unu *cot* luata je 1 ŝ. 3 d. semajne al 4 plenkreskuloj kaj 4 infanoj, havis krom bonajn vandojn nenion bonan, de la planko el krude prifrapitaj ŝtonoj ĝis la putra pajlotegmento.

217 *Originale:* „the parson and gentlefolks seem frit to death at them”.

## 12. *Worcestershire*

Domdetruado ĉi tie ne same ekscesa; sed de 1851 – 1861 la domanaro de ĉiu domo mezume kreskis de 4,2 al 4,6.

*Badsey*. Multaj cots kaj ĝardenetoj tie. Kelkaj farmistoj deklaras ke la cots estas grava misaĵo, ĉar ili venigas la malriĉulojn.[218] Al la klarigo de sinjoro:

> „La malriĉuloj fartas pro tio ne pli bone; se oni konstruas 500 *cots*, tiuj forluiĝas kvazaŭ panetoj, efektive, ju pli oni konstruas da ili, des pli necesas"

– laŭ li la domoj estigas la loĝantojn, kiuj naturleĝe premas „sur la rimedojn de loĝado" –, rimarkigas d-ro Hunter:

> „Nu, tiuj malriĉuloj devas veni de ie, kaj ĉar nenia aparta allogo ekzistas ĉi tie, ekz-e almozoj, devas esti mallogo de ia ankoraŭ pli malagrabla loko, kiu pelas ilin ĉi tien. Se ĉiu povus trovi iun *cot* kaj pecon da tero proksime de sia laborloko, tiam li certe preferus tion al *Badsey*, kie li pagas por sia manpleno da tero duoble tion, kion la farmisto pagas por la sia."

La konstanta elmigrado al la urboj, la konstanta „superfluigo" en la kamparo per koncentrado de la farmoj, transformado de kampoj en paŝtejojn, maŝinejojn ktp kaj la konstanta evikcio de la kampara loĝantaro per detruado de la kabanoj iras man-en-mane. Ju malpli da loĝantaro troviĝas en la distrikto, des pli granda estas ĝia „relativa superloĝantaro", des pli granda ĝia premo sur la dungrimedoj, des pli granda la absoluta plio de la kamparanoj super siaj loĝrimedoj, des pli granda estas do en la vilaĝoj la loka superloĝantaro kaj la plej pesteca homkunpremado. La densigo de la homamasoj en disaj vilaĝetoj kaj vilaĝegoj estas proporcia al la perforta malplenigo kiu okazas sur la surfaco de la lando. La senĉesa „superfluigo" de la kamplaboristoj malgraŭ ilia malkreskanta nombro kaj la samtempa kreskanta kvanto de ilia produkto naskas ilian paŭperecon. Tiu eventuala paŭpereco estas siavice motivo de ilia evikcio kaj la ĉefa kaŭzo de ilia loĝmizero, kiu rompas la lastan rezistkapablon kaj faris ilin puraj sklavoj de la grundsinjoroj[219] kaj farmistoj, tiel ke la minimumo de

218 *Originale:* „a great nuisance here, because they bring the poor". -vl

219 „La divolita okupado de la kamplaboristo donas dignon eĉ al lia pozicio. Li ne estas sklavo, sed pacsoldato kaj meritas sian lokon en loĝejo, kiu estas disponigenda al la edziĝinta viro fare de la grundsinjoro, kiu pretendis por si la rajton devigi lin al la laboro, simile kiel la lando procedas kun la militista soldato. Li ne ricevas la merkatvaloron por sia laboro same kiel soldato. Same kiel la soldaton oni kaptas ankaŭ lin, tiom longe kiom li estas juna kaj senscia kaj konas nur sian propran profesion kaj sian propran loĝlokon. Frua edziĝo

salajro fiksiĝas por ili kvazaŭ naturleĝo. Aliflanke la kamparo, malgraŭ sia konstanta „relativa superloĝantaro” estas samtempe tro malmulte loĝata. Tio montriĝas ne nur loke en tiuj punktoj, kie la foriro de homoj al urboj, minejoj, fervojkonstruejoj ktp okazas tro rapide, ĝi montriĝas ĉie dum la sezono de rikolto kiel ankaŭ printempe kaj somere dum la multaj monatoj, kiam la tre prizorgata kaj intensa angla kampkulturo bezonas kromajn manojn. Ĉiam estas tro da kamplaboristoj por la mezaj kaj ĉiam tro malmultaj por la esceptaj aŭ dumtempaj bezonoj de la kampkulturo.[220] Pro tio oni trovas en la oficialaj dokumentoj la kontraŭdiran plendon de la

---

kaj la praktikado de la diversaj leĝoj pri ekloĝado efikas sur la unuan kiel la soldatvarbado kaj la armea punleĝo al la alia.” (D-ro Hunter, l.c., p. 132.) Kelkfoje iu escepta grundsinjoro havas malfortan momenton kaj lia koro emociiĝas antaŭ la solecejo kiun li kreis. „Estas io melankolia, esti sola en sia lando”, diris la grafo de Leicester, kiam oni gratulis lin okaze de la finkonstruo de la domo de *Holkham*: „Mi rigardas ĉirkaŭ mi kaj vidas nenian domon krom mian propran. Mi estas la giganto de la giganta turo kaj s formanĝis ĉiujn miajn najbarojn.”

220 Simile okazas ekde la lastaj jardekoj en Francio, laŭ la mezuro en kiu tie la kapitalisma produktado trudiĝas al la kampkulturo kaj pelas la „superfluan” kamparan loĝantaron al la urboj. Ankaŭ ĉi tie: malboniĝintaj loĝaj kaj aliaj kondiĉoj ĉe la fonto de „superflua” loĝantaro. Pri la speciala kampara proletaro [en la originalo france: „*prolétariat foncier*”], kiun la parcelsistemo elkovis, vd la jam cititan verkon de Colins, kaj *Karl Marx: Der Achtzehnte Brumaire des Louis Bonaparte* [Karlo Markso: La dekoka brumero de Louis Bonaparte], 2-a eld., Hamburgo, 1869, p. 88 sj. <Vidu volumon 8, p. 198-204>. 1846 la urba loĝantaro en Francio estis 24,42 %, la kampara 75,58 %, 1861 la urba 28,86, la kampara 71,14 %. En la lastaj 5 jaroj la malpliiĝo de la kamparaj elcentpartoj de la loĝantaro estas ankoraŭ pli granda. Jam 1846 Pierre Dupont kantis en siaj „Ouvriers”:

> „Malbone vestitaj, loĝantaj en truoj,
> sub la tegmentoj, en la ruinaĵoj,
> ni vivas kun strigoj kaj ŝtelistoj,
> amikoj de mallumo.”
>
> [Originale:
>
> „*Mal vêtus, logés dans des trous,*
> *Sous les combles, dans les décombres,*
> *Nous vivons avec les hiboux*
> *Et les larrons, amis des ombres.*”]

samaj lokoj pri samtempa manko kaj troabundo de laborfortoj. La dumtempa aŭ loka manko de laborfortoj ne rezultigas altiĝon de salajro, sed devigas virinojn kaj infanojn labori en la kampoj kaj en ĉiam pli juna aĝo. Ekde kiam la ekspluatado de virinoj kaj infanoj iom ampleksiĝas, ĝi fariĝas siavice nova rimedo por superfluigi la viran kamplaboriston kaj por teni ties salajron malalta. En orienta Anglio montras belan rezulton de tiu diabla cirklo, la tiel nomata bandsistemo (*gang system*), pri kiu mi devas ĉi tie mallonge halti.[221]

Tiu bandsistemo regas preskaŭ ekskluzive en la distriktoj *Lincolshire, Huntingdonshire, Cambridgeshire, Norfolkshire, Suffolkshire* kaj *Nottinghamshire,* kaj sporade en la najbaraj distriktoj *Northampton, Bedford* kaj *Rutland*. *Lincolnshire* servu ĉi tie kiel ekzemplo. Granda parto de tiu distrikto estas nova, antaŭa marĉo aŭ ankaŭ, kiel en aliaj de la nomitaj orientaj distriktoj, konkeritaj el la maro. La vapormaŝino havis miraklajn rezultojn por la drenado. Antaŭa marĉo aŭ sabla grundo portas nun abundan grenmaron kaj la plej altajn rentojn. Same okazis pri la aluviaj terenoj gajnitaj de homa mano, kiel sur la insulo de *Axholme* kaj la ceteraj paroĥoj borde de Trento. En la mezuro, laŭ kiu la novaj farmejoj estiĝis, oni ne nur ne konstruis novajn kabanojn, sed forigis malnovajn, sed la laborfortojn provizis mejlojn distancaj malfermitaj vilaĝoj laŭlonge de la grandaj vojoj kiuj serpentumas flanke de la montetoj. Nur tie la loĝantaro trovis dum longa tempo sekurecon kontraŭ la longdaŭraj vintraj inundoj. Laboristoj loĝantaj en la farmbienoj de 400 ĝis 1.000 akreoj (ili nomiĝas tie „*confined labourers*”) servas ekskluzive por la konstanta peza terlaboro farata helpe de ĉevaloj. Por ĉiuj 100 akreoj (1 akreo = 40,49 aroj) troviĝas mezume apenaŭ unu kabano. Marska farmisto ekz-e eldiras antaŭ la esplorkomisiono:

> „Mia farmbieno etendiĝas sur 320 akreoj, ĉio grenkampoj. Ĝi ne havas kabanon. Unu laboristo loĝas nun ĉe mi. Mi havas kvar ĉevallaboristojn kiuj loĝas en la ĉirkaŭaĵo. La facila laboro, kiu bezonas multajn manojn, estas plenumata de bandoj.”[222]

La grundo bezonas multan facilan kamplaboron, ekz-e sarkadon de trudherboj, pioĉadon, senŝtonigon, iajn sterkadojn ktp. Tion faras la bandoj aŭ organizitaj bandoj, kiuj loĝas en la malfermitaj vilaĝoj.

Bando konsistas el dek ĝis kvardek aŭ kvindek personoj, nome virinoj,

221 La sesa kaj fina raporto de la Child. Empl. comm., publikigita fine de marto 1867, pritraktas nur la kampkulturan bandsistemon.

222 „*Child. Empl. Comm., VI. Report”, Evidence*, p. 37, n. 173.

gejunuloj (13- ĝis 18-jaraj), kvankam knaboj estas plej ofte eligitaj kiam ili fariĝas 13-jaraj, fine el geinfanoj (6- ĝis 13-jaraj). Ĉe la pinto staras la bandestro (*gangmaster*), ĉiam ordinara kamplaboristo, plej ofte tiel nomata malbonulo, vagabondo, diboĉulo, ebriulo, sed kun certa entreprenemo kaj talenta lerteco. Li varbas la bandon, kiu laboras sub li, ne sub la farmisto. Kun tiu li plej ofte interkonsentas pri laŭpeca laboro, kaj lia enspezo, kiu mezume ne tre multe superas tiun de ordinara kamplaboristo,[223] preskaŭ tute dependas de la lerteco, per kiu li sukcesas eltiri en kiom eble plej mallonga tempo kiom eble plej da laboro el sia bando. La farmistoj malkovris, ke virinoj nur sub vira komando bone laboras, sed ke virinoj kaj infanoj, ekde kiam ili vere laboras, elspezas sian vivoforton kun vera impeto – kion jam Furiero sciis –, dum la vira plenkreska laboristo estas sufiĉe ruza por ŝpari la sian. La bandestro iras de unu bieno al la alia kaj tiel okupas sian bandon dum ses ĝis ok monatoj jare. Esti dungita de li alportas do multe pli kaj pli sekuran enspezon por la laboristaj familioj ol de unuopa farmisto, kiu nur okaze laborigas infanojn. Tiu cirkonstanco firmigas lian influon en la malfermitaj vilaĝoj tiom, ke infanoj plej ofte dungeblas nur pere de li. Li ricevas kroman enspezon per tio, ke li individue, sendepende de la bando, alpruntas infanojn.

La malbonaj flankoj de tiu sistemo estas la troa laboro de la infanoj kaj junuloj, la monstraj marŝoj kiujn ili ĉiutage faras al kaj de la farmbienoj situantaj kvin, ses kaj kelkfoje sep mejlojn for, fine la demoraliziĝo de la bando. Kvankam la bandestro, kiu en kelkaj regionoj nomiĝas „*the driver*" (pelisto), estas ekipita per longa bastono, li tamen nur malofte uzas ĝin, kaj plendo pri brutala traktado estas escepto. Li estas demokratia imperiestro aŭ ia ratkaptisto de Hamelno[224]. Li bezonas do popularecon inter siaj subuloj kaj ligas ilin al si per la ĉarmo de cigana vivo floranta sub lia gvido. Kruda senĝeneco, gaja petolado kaj plej obscena diboĉado donas al la bando flugilojn. La bandestro plej ofte pagas siajn bandanojn en drinkejo kaj poste hejmen iras, eble ŝanceliĝante, dekstre kaj maldekstre apogata sur fortika ino, ĉekape de la kolono, dum malantaŭe la infanoj kaj junuloj petolas kantante mokajn kaj obscenajn kantojn. Tiuj rehejmiĝoj estas la triumfo de tio, kion Furiero nomas fanerogamio. Gravedigo

223 Tamen kelkaj bandestroj atingis per sia laboro la pozicion de farmistoj de 500 akreoj, aŭ de proprietuloj de tutaj domvicoj.

224 Aludo al la germana fabelo pri la urbo Hamelno, kies urbestro promesis al ratkaptisto altan sumon, se li sukcesas senratigi la urbon. La ratkaptisto, per magia fajfilo, kunvenigis ĉiujn ratojn de la urbo kaj forkondukis ilin. Sed ĉar la urbestraro ne pagis al li la interkonsentitan sumon, li revenis kaj per sia fajfilo kunvenigis ĉiujn infanojn de la urbo kaj forkondukis ilin por ĉiam. -vl

de dektri- kaj dekkvar-jaraĝaj knabinoj fare de siaj viraj samaĝuloj estas tre ofta. La malfermitaj vilaĝoj, el kiuj rekrutiĝas la bando, fariĝas Sodomo kaj Gomoroj[225] kaj liveras duoble da ekstergeedzaj naskoj ol la resto de la reĝlando. La moraleco de knabinoj breditaj en tiu lernejo, kiam ili estas edzinoj, estis jam supre indikita. Iliaj infanoj, se opio ne jam donis al ili la finan baton, estas antaŭdestinitaj rekrutoj de la bando.

La bando en sia ĵus priskribita klasika formo nomiĝas publika, komuna aŭ migra bando (*public, common or tramping gang*). Ekzistas ja ankaŭ privataj bandoj (*private gangs*). Ili havas la saman konsiston kiel la komunaj bandoj, sed havas malpli da membroj kaj laboras, anstataŭ sub la bandestro, sub iu maljuna framservisto, kiun lia mastro ne scias alie utiligi. Tie forestas ciganaj gajeco kaj humuro, sed laŭ ĉiaj eldiroj de atestantoj tie la pago kaj la traktado de infanoj pli malbonas.

La bandsistemo, kiu en la lastaj jaroj konstante etendiĝas.[226] ekzistas evidente ne pro la plaĉo de la bandestro. Ĝi ekzistas por pliriĉigi la grandajn farmistojn[227] resp. la grundsinjoron.[228] Por la farmisto ne ekzistas pli genia metodo teni siajn laboristojn profunde sub la normala nivelo kaj tamen disponi por ĉia kromlaboro ĉiam pri kromaj laborfortoj kaj per kiom eble plej malmulta mono elpremi kiom eble plej da laboro[229] kaj „superfluigi” la plenkreskan viran laboriston. Post la antaŭa klarigo kompreneblas, ke oni unuflanke koncedas la pli aŭ malpli longan kaj oftan senlaborecon de la kamplaboristo kaj samtempe deklaras „la bandsistem-

225 „La duono de la knabinoj de *Ludfort* ruiniĝis per la bando. (saml., *Appendix*, p. 6, n. 32)

226 „La sistemo tre pliiĝis en la lastaj jaroj. En kelkaj lokoj ĝi enkondukiĝis nur antaŭ nelonge, en aliaj, kie ĝi estas pli malnova, oni rekrutas pli kaj pli junajn infanojn en la bandon.” (saml., p. 79, n. 174)

227 „Etfarmistoj ne uzas la bandlaboron.” „Ĝi ne estas uzata sur malriĉa grundo, s sed sur grundo, kiu alportas 2 sterlingajn pundojn ĝis 2 pundoj 10 ŝilingoj da rento por ĉiu akreo.” (saml., p. 17 kaj 14)

228 Al unu el tiuj sinjoroj liaj rentoj gustas tiom bone, ke li indignite deklaras al la enketkomisiono, ke la tuta bruo estas nur pro la nomo de la sistemo. Se oni nomas ĝin anstataŭ „bando” „agrokultura industria kooperativo de la junularo”, tiam ĉio estus en ordo.

229 „Bandlaboro estas malpli kosta ol alia laboro, tio estas la kialo pro kiu ĝi estas uzata”, diras eksa bandestro. (saml., p. 17, n. 14) „La bandsistemo estas decide la plej malmultekosta por la farmisto kaj same decide la plej ruiniga por la infanoj”, diras farmisto. (saml., p. 16, n. 3)

on" „necesa", pro manko de vira laborforto kaj ties formigro al la urboj.[230] La kampo sen trudherbo kaj la homa trudherbo de *Lincolnshire* ktp estas poluso kaj kontraŭpoluso de la kapitalisma produktado.[231]

## *f)* Irlando

Fine de tiu ĉi paragrafo ne devas ankoraŭ por momento migri al Irlando. Unue la decidajn faktojn.

---

230„Sendube multa laboro farata nun de infanoj en bandoj estis antaŭe farata de viroj kaj de virinoj. Kie virinoj kaj infanoj aplikiĝas, estas nun pli da viroj senlaboraj (*more men are out of work*) ol antaŭe." (saml., p. 43, n. 202) Aliflanke i.a.: „La labordemando (*labour question*) en multaj kampkulturaj distriktoj, speciale en la grenproduktantaj, fariĝas tiom serioza pro la elmigrado kaj la facileco kiun la fervojoj ofertas por forigo al la grandaj urboj, ke mi" (la „mi" estas tiu de la administranto de granda proprietulo) „konsideras la servojn de infanoj absolute nemalhaveblaj." (saml., p. 80, n. 180) – Malsame ol en la resto de la civilizita mondo, la „demando de laboro" (*the Labour Question*) en la anglaj kampkulturaj distriktoj signifas nenion alian ol la demandon de la grundsinjoroj kaj farmistoj (*the landlord's and farmers' question*): Temas pri tio, kiel, spite al la ĉiam pli konsiderinda foriro de kampkulturaj laboristoj, eblos eternigi en la kamparo „relativan superloĝantaron" sufiĉe grandan por konservi „minimumon de salajro" por la kampara laboristo.

231La antaŭe de mi citita „*Public Health Report*", en kiu okaze de infanmorteco oni preterpase parolas pri la bandsistemo, restis nekonata al la gazetaro kaj do al la angla publiko. Male, la lasta raporto de la „*Child. Empl. Comm.*" liveris bonvenan sensaciaĵon al la gazetaro. Dum la liberala gazetaro demandis, kiel do la ŝikaj sinjoroj kaj sinjorinoj, kaj la bone pagataj klerikoj de la ŝtata eklezio de *Lincolnshire* povis sub siaj okuloj lasi elkreski tian sistemon sur siaj bienoj, la samaj homoj kiuj elsendas proprajn „misiojn por plibonigi la morojn de la pacifikaj sovaĝuloj" al la antipodoj – la pli fajna gazetaro faris ekskluzive konsiderojn pri la kruda senmoraleco de la kamparanoj, kiuj kapablas vendi siajn infanojn en tian sklavecon! Sub la malbenindaj cirkonstancoj, en kiujn „la delikatuloj" kondamnis la kampulon, ne mirigus, se tiu formanĝus siajn proprajn infanojn. Kio estas vere mirakla, tio estas la karaktera braveco, kiun li grandparte konservis. La oficialaj raportistoj pruvas, ke la gepatroj eĉ en la banddistriktoj abomenas la bandsistemon. „Oni trovas abundan pruvon en la de ni kolektitaj eldiroj de atestantoj, ke la gepatroj en multaj okazoj estus dankemaj pro deviga leĝo, kiu ebligus al ili rezisti al la tentoj kaj premo, al kiuj ili estas ofte submetitaj. Jen la paroĥa oficisto, jen la dungisto trudas al ili, sub minaco de ilia propra maldungo, sendi la infanojn al lukro anstataŭ en la lernejon … Ĉia perdo de tempo kaj de forto, ĉia sufero,

La loĝantaro de Irlando estis 1841 kreskinta al 8.222.664 personoj, 1851 ŝrumpinta al 6.623.985, 1861 al 5.850.309, 1866 al 5 milionoj kaj duono, proksimume al la nivelo de 1801. La malpliiĝo komenciĝis en la malsatjaro 1846, tiel ke Irlando en malpli ol 20 jaroj perdis pli ol $^{5}/_{16}$ da sia loĝantaro.[232] Ĝia entuta elmigro de majo 1851 ĝis 1865 estis de 1.591.487 personoj, la elmigro dum la lastaj kvin jaroj 1861-1865 pli ol duona miliono. La nombro de priloĝataj domoj malpliiĝis de 1851-1861 je 52.990. De 1851 ĝis 1861 la nombro de farmbienoj kreskis de 15 – 30 akreoj je 61.000, tiu de la farmbienoj de pli ol 30 akreoj je 109.000, dum la sumo de ĉiaj farmbienoj malaltiĝis je 120.000, do malkresko ŝuldata ekskluzive al la neniigo de farmbienoj sub 15 akreoj, alivorte per ilia centralizo.

La malkresko de la loĝantaro estis kompreneble ĝenerale akompanata de malpliiĝo de la produktokvanto. Por nia celo sufiĉas konsideri la kvin jarojn 1861 – 1865, dum kiuj pli ol duona miliono elmigris kaj la absoluta nombro de la popolo malkreskis je pli ol okona miliono (vd la tabelon A).

*Tabelo A. nombro de brutoj*

kiu faras al la kulturisto kaj al lia familio eksterordinaran kaj senutilan lacecon, ĉiuj kazoj, en kiuj la gepatroj povas atribui la moralan perdon de siaj infanoj al la trologateco de la kabanoj kaj al la fiaj influoj de la publika bando, incitas en la brusto de la laborantaj malriĉuloj sentojn, kiujn oni ja komprenas kaj kiujn necesas detaligi. Ili havas konscion pri tio, ke oni kaŭzas al ili multan korpan kaj spiritan turmenton per la cirkonstancoj, pri kiuj ili neniel respondecas, al kiuj ili, se tio estintus en ilia povo, neniam konsentintus kaj kontraŭ kiuj lukti ili estas senpovaj. (saml., p. XX, n. 82 kaj XXIII, n. 96)

232 Loĝantaro de Irlando: 1801: 5.319.867 personoj, 1811: 6.084.996, 1821: 6.869.544, 1831: 7.828.347, 1841: 8.222.664.

| **jaroj** | **1860** | **1861** | **1862** | **1863** | **1864** | **1865** |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **ĉevaloj** | | | | | | |
| tuta nombro | 619.811 | 614.232 | 602.894 | 579.978 | 562.158 | 547.867 |
| malpliiĝo | | 5.993 | 11.338 | 22.916 | 17.820 | 14.291 |
| **kornbestoj** | | | | | | |
| tuta nombro | 3.306.374 | 3.471.688 | 3.254.890 | 3.144.231 | 3.262.294 | 3.493414 |
| malpliiĝo | | 138.316 | 216.798 | 110.695 | | |
| pliiĝo | | | | | 118.063 | 231.120 |
| **ŝafoj** | | | | | | |
| tuta nombro | 3.542.080 | 3.556.050 | 3.456.132 | 3.308.204 | 3.366.941 | 3.688.742 |
| malpliiĝo | | | 99.918 | 147.982 | | |
| pliiĝo | | | | | 58.737 | 321.801 |
| **porkoj** | | | | | | |
| tuta nombro | 1.271.072 | 1.102.042 | 1.154.324 | 1.067.458 | 1.058.480 | 1.299.893 |
| malpliiĝo | | 169.030 | | 86.866 | 8.978 | |
| pliiĝo | | | 52.282 | | | |

La supra tabelo donas jenan rezulton:

| **ĉevaloj** | **kornbestoj** | **ŝafoj** | **porkoj** |
|---|---|---|---|
| abs. malplio | abs. malplio | abs. malplio | abs. malplio |
| 772.358 | 116.626 | 146.608 | 28.819 |

[233]

Ni rigardu nun la kampkulturon, kiu liveras la vivrimedojn por brutoj kaj homoj. En la sekva tabelo kalkuliĝis la pliiĝo aŭ malpliiĝo por ĉiu unuopa jaro kun rilato al la rekte antaŭa. La rubriko *greno* entenas tritikon, avenon, hordeon, sekalon, fazeolojn kaj pizojn, tiu de *verdaĵoj* terpomojn, furaĝbetojn, folibetojn, rafanojn, brasikon, flavajn karotojn, pastinakojn, viciojn ktp.

*Tabelo B: Pliiĝo aŭ malpliiĝo de la akreoj uzataj por kulturado aŭ kiel varo resp. kiel paŝtejo*

233 La rezulto montriĝus pli malbona, se ni irus pli malantaŭen. Ekz-e ŝafoj 1865: 3.688.742, sed 1856: 3.694.294; Porkoj 1865: 1.299.893, sed en 1858: 1.409.883.

| jaro | 1861 | 1862 | 1863 | 1864 | 1865 | 1861-1865 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **greno** | | | | | | |
| malpli (akreoj) | 15.701 | 72.734 | 144.719 | 122.437 | 72.450 | 428.041 |
| **verdaĵoj** | | | | | | |
| malpli (akreoj) | 36.974 | 74.785 | 19.358 | 2.317 | | 107.984 |
| pliiĝo | | | | | 25.241 | |
| **herboj kaj trifolioj** | | | | | | |
| malpli (akreoj) | 47.969 | | | | | |
| pliiĝo | | 6.623 | 7.724 | 47.486 | 68.970 | 32.834 |
| **lino** | | | | | | |
| malpli (akreoj) | | | | | 50.159 | |
| pliiĝo | 19.271 | 2.055 | 63.922 | 87.761 | | 122.860 |
| **ĉiaj grundoj servantaj por kampkulturo kaj brutaro** | | | | | | |
| malpli (akreoj) | 81.873 | 128.841 | 92.431 | | 28.218 | 330.860 |
| pliiĝo | | | | 10.493 | | |

En la jaro 1865 sub la rubriko „herbejoj” aldoniĝis 127.470 akreoj, ĉefe ĉar la akreoj sub la rubriko „neuzataj terenoj kaj torfmarĉo” malpliiĝis je 101.543. Se ni komparas la jaron 1865 kun 1854, ni konstatas malpliiĝon de greno je 246.667 kvartoj, el kiuj 48.999 estas tritiko, 166.605 aveno, 29.892 hordeo ktp; malpliiĝo de terpomoj, kvankam la areo de ilia kultivado kreskis, je 44.398 tunoj, ktp (vidu la tabelon C).

Tabelo C: Pliiĝo aŭ malpliiĝo de la areo de kulturata grundo, de la produkto po akreo, kaj de la ĉiomprodukto de 1865 kompare kun 1864[234]

234 La indikoj de la teksto estas kunmetitaj el la materialo de la *Agricultural Statistics, Ireland. General Abstract*, Dublino, por la jaroj 1860 sj kaj *Agricultural Statistics, Ireland. Tables showing the Estimated Average Produce* ktp”, Dublino, 1867. Oni scias, ke tiu statistiko estas oficiala kaj estas ĉiujare prezentata al la parlamento.

*Aldono al la 2-a eldono:* La oficiala statistiko montras por la jaro 1872 malkreskon de la areo de kulturata grundo – kompare kun 1871 – de 134.915 akreoj. Okazis „pliiĝo” de kulturado de verdaĵoj – furaĝbetoj, folibetoj k. s.; „malpliiĝo” de kulturado de 16.000 akreoj por tritiko, 14.000 akreoj por aveno, 4.000 akreoj por hordeo kaj sekalo, 66.632 akreoj por terpomoj, 34.667 akreoj por lino kaj 30.000 akreoj malpli da herbejoj, trifolio, vicioj kaj oleorapoj. La grundo sub tritikkultivo montras en la lastaj kvin jaroj la sekvajn ŝtupojn de malpliiĝo: 1868: - 285.000 akreoj; 1869: - 280.000; 1870: - 259.000; 1871: - 244.000; 1872: - 228.000. Por 1872 ni trovas en rondigita

*Produktoj kultivata tereno 1865 kompare kun 1864*

| | 1864 | 1865 | pliiĝo | malpliiĝo |
|---|---|---|---|---|
| **tritiko** | 276.483 | 266.989 | | 9.494 |
| **aveno** | 1.814.886 | 1.745.228 | | 69.658 |
| **hordeo** | 172.700 | 177.102 | | 69.658 |
| **sekalo** | 8.894 | 10.091 | 4.402 | |
| **terpomoj** | 1.039.724 | 1.066.260 | 26.256 | |
| **betoj** | 337.355 | 334.212 | | 3.143 |
| | 14.073 | 14.389 | 316 | |
| **brasiko** | 31.821 | 33.622 | 1.801 | |
| **lino** | 31.693 | 251.433 | | 50.260 |
| **fojno** | 1.609.560 | 1.678.493 | 68.924 | |

| **Produkto po akreo** | | | **kompare kun 1865** | |
|---|---|---|---|---|
| | **1864** | **1865** | **pliiĝo** | **malpliiĝo** |
| **tritiko (kvartoj)** | 13,3 | 13 | | 0,3 |
| **aveno (kvartoj)** | 12,1 | 12 | 0,2 | |
| **hordeo (kvartoj)** | 14,9 | 14,9 | | 1 |
| **- (kvartoj)** | 16,4 | 14,8 | | 1,6 |
| **sekalo (kvartoj)** | 8,5 | 10,4 | 1,9 | |
| **terpomoj (tunoj)** | 4,1 | 3,6 | | 0,5 |
| **betoj (tunoj)** | 10,3 | 9,9 | | 0,4 |
| **- (tunoj)** | 10,5 | 13,3 | 2,8 | |
| **brasiko (tunoj)** | 9,3 | 10,4 | 1,1 | |
| **lino (14-funtonoj)** | 34,2 | 25,2 | | 9 |
| **fojno (tunoj)** | 1,6 | 1,8 | 0,2 | |

nombro pliiĝon de 2.600 ĉevaloj, 80.000 kornbrutoj, 68.6000 ŝafoj kaj malpliiĝon de 236.000 porkoj.

| **Tuta produkto** | | | **kompare kun 186!** | |
|---|---|---|---|---|
| | **1864** | **1865** | **pliiĝo** | **malpliiĝc** |
| **tritiko (kvartoj)** | 875.782 | 826.783 | | 48.909 |
| **aveno (kvartoj)** | 7.826.332 | 7.659.727 | | 166.605 |
| **hordeo (kvartoj)** | 761.909 | 732.017 | | 29.892 |
| **- (kvartoj)** | 15.160 | 13.989 | | 1.171 |
| **sekalo (kvartoj)** | 12.680 | 18.864 | 5.684 | |
| **terpomoj (tunoj)** | 4.312.388 | 3.865.990 | | 446.398 |
| **betoj (tunoj)** | 3.467.659 | 3.301.683 | | 165.976 |
| **- (tunoj)** | 147.284 | 191.937 | 44.653 | |
| **brasiko (tunoj)** | 297.375 | 350.252 | 52.877 | |
| **lino (14-funtonoj)** | 64.506 | 39.751 | | 24.945 |
| **fojno (tunoj)** | 2.607.153 | 3.068.707 | 461.554 | |

De la ŝanĝiĝo de la loĝantaro kaj de la grundproduktado de Irlando ni transiras nun al la ŝanĝiĝo en la borso de la grundsinjoroj, grandaj farmistoj kaj industriaj kapitalistoj. Ili speguliĝas en la pliiĝo kaj malpliiĝo de la enspeza imposto. Por kompreni la sekvan tabelon Ĉ, mi aldonas, ke la rubriko D (profitoj kun escepto de farmistprofitoj) entenas ankaŭ tiel nomatajn „profesiajn" profitojn, t.e. la enspezoj de advokatoj, kuracistoj ktp, sed la ne aparte detaligitaj rubrikoj C kaj E la enspezojn de oficistoj, oficiroj, ŝtat-sinekuristoj, ŝtatkreditoroj ktp.

*Tabelo Ĉ*

La enspezoj submetitaj al enspezimposto en sterlingaj pundoj[235]

| **jaro** | **1860** | **1861** | **1862** | **1863** | **1864** | **1865** |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **A: grundrento** | 12.893.829 | 13.003.554 | 13.308.938 | 13.494.091 | 13.470.700 | 13.801.616 |
| **B: farmistprofitoj** | 2.765.387 | 2.773.644 | 2.937.899 | 2.938.823 | 2.930.874 | 2.946.072 |
| **D: Industriaj ktp** | 4.891.652 | 4.863.203 | 4.858.800 | 4.846.497 | 4.546.147 | 4.850.199 |
| **ĉiuj A ĝis D** | 22.962.885 | 22.998.394 | 23.597.574 | 23.658.631 | 23.236.298 | 23.930.340 |

En la rubriko D la pliiĝo de la enspezo en jara mezumo de 1853 ĝis 1864 estis nur 0,93 elcentoj, dum ĝi en la sama periodo en Britio estis 4,58. La sekva tabelo montras la disdividon de la profitoj (kun ekskludo de la farmistprofitoj) por la jaroj 1864 kaj 1867:

*Tabelo D*

235„*Tenth Report of the Commissioners of Inland Revenue*", Londono, 1866.

Rubriko D. Enspezoj el profitoj (pli ol 60 sterlingaj pundoj) en Irlando.[236]

| | £ distribuitaj en 1864 | | £ distribuitaj en 1865 | |
|---|---|---|---|---|
| | pundoj | personoj | pundoj | personoj |
| **tuta jarenspezo de ...** | 4.368.610 | 17.467 | 4.669.979 | 18.081 |
| **jarensp. > 60, < 100 £** | 238.626 | 5.015 | 222.575 | 4.703 |
| **el la jara ĉiomenspezo** | 1.979.066 | 11.321 | 2.028.471 | 12.184 |
| **resto de la jara ĉiom-enspezo de ...** | 2.150.818 | 1.131 | 2.418.833 | 1.194 |
| **el kiuj** | 1.073.906 | 1.010 | 1.097.927 | 1.044 |
| | 1.076.912 | 121 | 1.320.906 | 150 |
| | 430.535 | 95 | 584.458 | 2 |
| | 646,377 | 26 | 736.448 | 28 |
| | 262.819 | 3 | 274.528 | 3 |

Anglio, lando de evoluinta kapitalisma produktado kaj ĉefe industria, estus elsangiĝinta per tioma perdo de loĝantaro kian suferis la ira. Sed Irlando estas nuntempe nur de larĝa akvofoso disbarita kampkultura distrikto de Anglio, al kiu ĝi liveras grenon, lanon, bruton, industriajn kaj armeajn rekrutojn.

La senpopoligo metis multan grundon ekster kultivadon, tre malpliigis la grundprodukton[237] kaj, malgraŭ la etendita areo de brutbredado, estigis en kelkaj ĝiaj branĉoj absolutan malpliiĝon, en aliaj apenaŭ menciindan, de konstantaj malprogresoj interrompatan progreson. Tamen kun la malpliiĝo de la popolamaso konstante kreskis grundrentoj kaj farmprofitoj, kvankam tiuj lastaj ne same konstante kiel la unuaj. La kaŭzo estas facile komprenebla. Unuflanke tie per kunmetado de la farmoj kaj la transformado de kampoj en paŝtejojn sufiĉe granda parto de la ĉiomprodukto transformiĝis en plusprodukton. La plusprodukto kreskis, kvankam la ĉiomprodukto, de kiu ĝi estas parto, malkreskis. Aliflanke la monvaloro de tiu plusprodukto kreskis ankoraŭ pli rapide ol ĝia kvanto, pro la ekde la lastaj dudek kaj tute speciale ekde la lastaj dek jaroj kreskantaj anglaj

236 La jara ĉiomenspezo sub la rubriko D ne identas ĉi tie kun la antaŭa tabelo, pro certaj leĝe permesataj deprenoj.

237 Kvankam la produkto proporcie laŭ akreo malpliiĝas, oni ne forgesu, ke Anglio de unu jarcento kaj duono malrekte eksportis la grundon de Irlando, sen permesi al ĝiaj kulturantoj havi eĉ nur la rimedojn por anstataŭigi la elĉerpitajn partojn de la grundo.

merkatprezoj por viando, lano ktp.

Disaj produktadrimedoj, kiuj servas al la produktanto mem kiel labor- kaj viv-rimedoj, sen valorigi sin per enkorpigo de fremda laboro, tute ne estas kapitalo, same kiel la produkto konsumata de sia propra produktinto ne estas varo. Se kun la kvanto de loĝantaro malkreskis en la kampkulturo ankaŭ la kvanto de uzataj produktadrimedoj, la kvanto de la en ĝi aplikata kapitalo kreskis, ĉar parto de antaŭe disaj produktadrimedoj transformiĝis en kapitalon.

La ĉiomkapitalo de Irlando investita ne en la kampkulturo, sed en industrio kaj komerco, akumuliĝis dum la lastaj du jardekoj malrapide kaj kun konstanta granda fluktuiĝo. Des pli rapide evoluis, male, la koncentr-ado de ĝiaj individuaj partoj. Fine, kvankam ĝia absoluta kresko estis malgranda, ĝi estis relative ŝvelinta, en proporcio al la malmultiĝinta loĝantaro.

Ĉi tie okazas do, sub niaj okuloj, grandskale, procezo tia, kian la ortodoksa ekonomiko ne povis deziri pli bela por konfirmi sian dogmon, laŭ kiu la mizero fontas el absoluta superloĝantaro kaj la ekvilibro restariĝas per malpliigo de la loĝantaro. Tio estas tute multe pli grava eksperimento ol tiu de la *Malthus*-anoj tiom glorata pesto meze de la dek-kvara jarcento. Kroma rimarko: voli apliki al la ekonomiaj kondiĉoj de la 19-a jarcento kaj al ties respondaj moviĝoj de la loĝantaro, la mezurilon pruntitan el la 14-a jarcento, tio estis jam per si mem pedante naiva, sed krome tiu naiveco pretervidis la fakton, ke se al tiu pesto kaj la ĝin akompananta malpliiĝo de la loĝantaro sekvis en Anglio liberiĝo kaj riĉiĝo de la kamparanoj, aliflanke de la Kanalo, en Francio, sekvis pli granda servuto kaj pli granda mizero al ĝi.[238]

La malsatmizero mortigis en la jaro 1846 en Irlando pli ol milionon da homoj, sed nur malriĉulojn. Ĝi neniel tuŝis la riĉulojn de la lando. La sekvanta dudekjara kaj ankoraŭ daŭre ŝvelanta eliro ne malpliigas, kiel ekzemple dum la Tridekjara Milito, kun la homoj samtempe iliajn pro-duktadrimedojn. La ira genio inventis tute novan metodon forsorĉi malriĉan popolon milojn da mejloj for de la mizerejo. La elmigrintoj

238 Ĉar Irlando estas konsiderata la promesita lando de la „loĝantarprincipo”, Th. Sadler, antaŭ ol publikigi sian verkon pri la loĝantaro, aperigis sian faman libron „I*reland, its Evils and their Remedies*”, 2-a eld., Londono, 1829, en kiu la per komparo de la statistikoj de la unuopaj provincoj, kaj en ĉiu provinco de la unuopaj distriktoj, pruvas, ke la mizero regas tie ne, kiel Malthus kredas, en proporcio al la nombro de loĝantoj, sed en inversa proporcio al ĝi.

irintaj en Usonon sendas ĉiujare monsumojn hejmen, vojaĝrimedojn por la postrestintoj. Ĉiu grupo, kiu ĉi-jare elmigras, tiras post si en la venonta jaro plian grupon. Anstataŭ kosti al Irlando ion, la elmigrado konsistigas tiel unu el la plej enspezigaj branĉoj de sia eksportkomerco. Ĝi estas fine sistema procezo, kiu tute ne provizore boras truon en la popolamason, sed elpumpas el ĝi ĉiujare pli da homoj ol la idaro anstataŭas, tiel ke la absoluta nombro de la loĝantaro malkreskas de jaro al jaro.[239]

Kiuj estis la sekvoj por la postrestintaj laboristoj de Irlando, liberigitaj el la superloĝateco? Jen: ke la relativa superloĝantaro estas hodiaŭ same granda kiel antaŭ 1846, ke la salajro estas same malalta kaj la laboro pli elĉerpiga, ke la mizero en la kamparo jam ree proksimigas novan krizon. La kaŭzoj estas simplaj. La revolucio en la kampkulturo iris sampaŝe kun la elmigrado. La relativa superloĝantaro kreskis pli rapide ol la absoluta malpliiĝo de la loĝantaro. Rigardo al la tabelo B montras, ke la transformado de kampoj en brutpaŝtejojn devas en Irlando ankoraŭ pli akre efiki ol en Anglio. En Anglio kreskas kun la bredado ankaŭ la kulturado de verdaĵoj, en Irlando ĝi malkreskas. Dum grandaj kvantoj de antaŭe prilaborataj kampoj ne estas kulturataj aŭ transformataj en konstantan herbejon, granda parto de la antaŭe neuzata grundo kaj de marĉo servas por etendi la bredadon de brutaro. La etaj kaj mezaj farmistoj – mi enkalkulas ĉiujn, kiuj kulturas ne pli ol cent akreojn – estas daŭre proksimume ok dekonoj el ĉiuj farmistoj.[240] Ili estas pli kaj pli, kaj en multe pli alta grado ol antaŭe, premataj de la konkurenco de la kapitalisme organizita kampkulturado kaj do liveras konstante novajn rekrutojn al la klaso de dunglaboristoj. La sola granda industrio de Irlando, la tolfabrikado, bezonas relative malmultajn plenkreskajn virojn kaj dungas entute, malgraŭ sia ekspansio ekde la prezaltiĝo de kotono 1861 – 1866, nur relative sensignifan parton de la loĝantaro. Same kiel ĉiu alia granda industrio ĝi produktas per konstanta fluktuado en sia propra sfero konstante relativan superloĝantaron, eĉ dum absoluta kresko de la homkvanto sorbata de ĝi. La mizero de la kamparanoj estas la bazo de la gigantaj ĉemizfabrikoj ktp, kies laborista armeo troviĝas plejparte dise tra la plata lando. Ni retrovas ĉi tie la antaŭe priskribitan sistemon de domlaboro, kiu per subnivela pagado kaj superlaboro posedas siajn sistemajn rimedojn por estigi superloĝantaron. Fine, kvankam la senpopoligo ne havas same detruajn sekvojn kiel en lando de evoluinta kapitalisma produktado, ĝi

239 Por la periodo de 1851 ĝis 1874 la tuta nombro de elmigrintoj estas 2.325.922.

240 *Noto al la 2-a eld.:* Laŭ tabelo en Murphy: „*Ireland, Industrial, Political, and Social*", 1870, 94,6 % de la grundo konsistas el farmoj ĝis 100 akreoj kaj 5,4 % el farmoj super 100 akreoj.

okazas ne sen konstanta reefiko sur la internan merkaton. La breĉo, kiun la elmigrado ĉi tie kreas, ne nur reduktas la lokan bezonon je dungiĝo, sed ankaŭ la enspezojn de la etkomercistoj, metiistoj, de la etindustriistoj entute. El tio klariĝas la malkresko de la enspezoj inter 60 kaj 100 pundoj en la tabelo D.

Klara prezento de la situacio de la kamparaj taglaboristoj en Irlando troviĝas en la raportoj de la irlandaj inspektistoj de malriĉul-administrado (1870).[241] Oficistoj de registaro, kiu tenas sin nur per la bajonetoj kaj per la jen deklarita, jen vualita sieĝostato, ili ĉiuj devas observi la lingvajn konsiderojn, kiujn iliaj kolegoj en Anglio malrespektas. Tamen ili ne lasas sian registaron luliĝi en iluzioj. Laŭ ili, la daŭre tre malalta salajrokvoto en kampkulturo mezume en la lastaj dudek jaroj tamen altiĝis je 50 ĝis 60 elcentoj kaj estas nun je mezume 6 ĝis 9 ŝilingoj semajne. Sed malantaŭ tiu ŝajna altiĝo kaŝiĝas reala falo de la salajro, ĉar ĝi eĉ ne kompensas la intertempe okazintan prezaltiĝon de la necesaj vivrimedoj; kion pruvas la sekva eltiraĵo el la oficialaj kalkuloj de ira *workhouse*.

*Semajna mezumo de pokapaj vivtenaj kostoj*

| jaro | nutraĵoj | vestaĵoj | entute |
|---|---|---|---|
| 1848-09-29 ĝis 1849-09-29 | 1 ŝ. 3,25 d. | 0 ŝ. 3 d. | 1 ŝ. 6,25 d. |
| 1868-09-29 ĝis 1869-09-29 | 2 ŝ. 7,25 d. | 0 ŝ. 6 d. | 3 ŝ. 1,25 d. |

La prezo de la necesaj vivrimedoj estas do preskaŭ duoble, kaj tiu de la vestaĵoj precize duoble pli alta ol antaŭ dudek jaroj.

Eĉ sendepende de tiu misrilato, nura komparo de la en mono esprimita salajrokvoto tute ne liveras ĝustan rezulton. Antaŭ la malsatmizero la plej granda kvanto de la kamparaj salajroj estis pagataj per naturaĵoj, nur la plej malgranda parto mone; hodiaŭ monpago estas la regulo. Jam el tio sekvas, ke, kia ajn la moviĝo de la reala salajro estas, ĝia monkvoto devis kreski.

„Antaŭ la malsatmizero la kampa taglaboristo posedis pecon da tero, sur kiu li

241 „*Reports from the Poor Law Inspectors on the wages of Agricultural Labourers in Ireland*", Dublino, 1870. – Kp ankaŭ „*Agricultural Labourers (Ireland) Return* ktp", *8. March 1861*.

> kulturis terpomojn kaj bredis prokoin kaj kortbirdojn. Nuntempe li ne nur devas aĉeti ĉiujn siajn vivrimedojn, sed li ankaŭ malhavas la enspezon el la vendo de porkoj, kortbirdoj kaj ovoj."[242]

Fakte antaŭe la kamplaboristoj kunfandiĝis kun la etfarmistoj kaj plej ofte konsistigis nur ian ariergardon de la mezaj kaj grandaj farmoj, ĉe kiuj ili estis dungitaj. Nur ekde la katastrofo de 1846 ili komencis konsistigi etan parton de la klaso de puraj dunglaboristoj, apartan staton, kiu estas ligita kun siaj mastroj jam nur per monrilatoj.

Oni scias, kia estis ilia loĝstato de 1846. De tiam ĝi ankoraŭ pli malboniĝis. Parto de la kamparaj taglaboristoj, kiu tamen de tago al tago malkreskas, loĝas ankoraŭ sur la teroj de la farmisto en superloĝataj kabanoj, kies abomenaĵoj multe superas la plej fiajn, kiajn prezentis al ni la anglaj kamparaj distriktoj. Kaj tiel statas ĝenerale, escepte de kelkaj partoj de *Ulster*; sude en la distriktoj *Cork, Limerick, Kilkenny* ktp; oriente en *Wicklow, Wexford* ktp; centre en *King's* kaj *Queen's County*, Dublino ktp; norde en *Down, Antrim, Tyrone* ktp; okcidente en Sligo, *Roscommon, Mayo, Galway* ktp. Iu el la inspektistoj ekkrias: *„La kabanoj de la kamplaboristoj estas honto por la religio kaj la civilizacio de tiu ĉi lando."*[243] Kaj por igi al la taglaboristoj la loĝadon en iliaj kavernoj pli eltenebla, oni sisteme konfiskas la pecon da tero, kiu de pratempo estis parto de ili.

> „La nura sento ke ili estas submetitaj al tia premo de la grundsinjoroj kaj ties mastrumantoj, … naskis en la mensoj de la laboristoj respondajn sentojn de antagonismo kaj de malamo kontraŭ tiuj, kiuj traktas ilin kiel … senrajtan rason."[244]

La unua ago de la kampkultura revolucio estis plej grandskale kaj kvazaŭ desupre donita komando, forbalai la kabanojn, kiuj troviĝis sur la laborkampo. Multaj laboristoj estis tiel devigataj serĉi ŝirmon en vilaĝoj kaj urboj. Tie oni ĵetis ilin kvazaŭ rubaĵon en subtegmentejojn, truojn, kelojn kaj en la kaŝejojn de la plej fiaj kvartaloj. Miloj da iraj familioj, kiuj eĉ laŭ la atestoj de angloj embarasitaj de naciaj antaŭjuĝoj distingiĝas per sia rara ligiteco al la hejmo, per sia senzorga gajeco kaj per hejma morpureco, troviĝis subite transmetitaj en la forcejoj de la malvirto. La viroj devas nun serĉi laboron ĉe najbaraj farmistoj kaj estas dungataj nur por la tago, do en la plej malcerta dungformo; ĉe tio

242 Saml., p. 29, 1.

243 Saml., p. 12.

244 Saml., p. 12.

> „ili devas nun iri longajn vojojn al la farmo kaj reen, ofte malsekaj kiel ratoj kaj elemetitaj al aliaj maloportunaĵoj, kiuj tre ofte kaŭzas malfortiĝon, malsanon kaj per tio mankon”.[245]

„La urboj devis jaron post jaro akcepti tion, kio estis konsiderata superfluaj laboroj en la kamparaj distriktoj”,[246] kaj ĉe tio oni ankaŭ miras, ke en la urboj kaj vilaĝoj regas abundo, kaj en la kamparo manko de laboristoj!”[247] La vero estas, ke tiu manko sentiĝas nur „tempe de plej urĝaj kamparaj laboroj, printempe kaj aŭtune, dum por la resto de la jaroj multaj manoj restas senfaraj”;[248] ke „post la rikolto, de oktobro ĝis la printempo, apenaŭ ekzistas okupo por ili”,[249] kaj ke ili ankaŭ dum la okupata tempo „tre ofte perdas tutajn tagojn kaj estas elmetitaj al ĉiaj laborinterrompoj”.[250]

Tiuj sekvoj de la kampkultura revolucio, t.e. la transformado de kampoj en paŝtejojn, la aplikado de maŝinoj, la plej strikta ŝparado de laboro ktp – ankoraŭ akriĝas per la modelaj grundsinjoroj, tiaj, kiuj, anstataŭ konsumi siajn rentojn eksterlande, estas tiom favorkoraj loĝi en Irlando sur siaj bienoj. Por ke la leĝo de postulo kaj propono restu tute sendifekta, tiuj sinjoroj tiras

> „nun preskaŭ sian tutan laborbezonon el siaj etfarmistoj, kiuj estas tiel devigataj laboregi por siaj grundsinjoroj por ĝenerale pli malalta salajro ol tiu de la ordinaraj taglaboristoj, kaj tio sen ajna konsidero al la malkomfortaĵoj kaj perdoj kiuj estiĝas el tio, ke ili dum la tikla tempo de semado aŭ rikoltado devas neglekti siajn proprajn kampojn”.[251]

La malcerteco kaj malreguleco de la dungo, la oftega reveno kaj longa daŭro de laborblokiĝoj, ĉiuj tiaj simptomoj de relativa superloĝantaro troviĝas do en la raportoj de la inspektistoj de la malriĉul-administracio kiel en la same multaj plendoj de la ira kamplaborista proletaro. Oni memoru, ke ni ĉe la angla kampara proletaro renkontis similajn fenomenojn. Sed la diferenco estas, ke en Anglio, industria lando, la industria rezervarmeo rekrutiĝas en la kamparo, dum en Irlando, kampkultura lando, la kampkultura rezervo rekrutiĝas en la urboj, la rifuĝejoj de la elpelitaj

245 Saml., p. 25.

246 Saml., p. 27.

247 Saml., p. 26.

248 Saml., p. 1.

249 Saml., p. 32.

250 Saml., p. 25.

251 Saml., p. 30.

kamplaboristoj. Tie la superfluuloj de la kampkulturo transformiĝas en fabriklaboristojn; ĉi tie en urben pelitoj, dum ili samtempe premas sur la urba salajro, restas kamplaboristoj kaj estas konstante resendata en la kamparon por trovi laboron.

La oficialaj raportistoj resumas la materian situacion de la kampkulturaj taglaboristoj jene:

> „Kvankam ili vivas plej simple, ilia salajro tamen sufiĉas por akiri por ili kaj por iliaj familioj nutraĵon kaj loĝadon; por vestaĵoj ili bezonas kromajn enspezojn … La atmosfero en iliaj loĝejoj, kune kun aliaj mankoj, elmetas tiun klason en tute aparta grado al tifo kaj ftizo.”[252]

Laŭ tio ne estas mirige, ke, laŭ unuanima atesto de la raportistoj, malserena malplezuro trapenetras la vicojn de tiu klaso, ke ĝi sopiras la pasintecon, abomenas la estantecon, malesperas pri la estonteco, „fordonas sin al la fiaj influoj de demagogoj” kaj havas nur tiun unu fiksan ideon elmigri al Ameriko. Kaj tio estas la kuklando, en kiun la granda malthus-a panaceo, la senpopoligo, transformis la verdan *Erin* <Irlandon>!

Kian prosperan vivon la iraj manufakturlaboristoj vivas, pri tio sufiĉas unu ekzemplo:

> „Dum mia ĵusa inspekto de la nordo de Irlando”, diras la angla fabrikinspektisto Robert Baker, „mirfrapis min la klopodo de lerta ira laboristo, doni edukadon al siaj infanoj malgraŭ siaj malabundaj rimedoj. Mi citas lian eldiron laŭvorte, tian kian mi ricevis ĝin el lia buŝo. Ke li estas lerta laboristo, tion oni scias, se mi diras ke oni uzas lin por artikloj por la merkato de Manĉestro. Johnson: Mi estas apretisto kaj laboras de la sesa matene ĝis la dekunua nokte, de lundo ĝis vendredo; sabate ni finas je la sesa vespere kaj havas tri horojn por manĝo kaj ripozo. Mi havas kvin infanojn. Por tiu laboro mi ricevas dek ŝilingojn kaj 6 pencojn semajne; mia edzino laboras ankaŭ kaj gajnas kvin ŝilingojn semajne. La plej aĝa knabino, dekdujara, prizorgas la domon. Ŝi estas nia kuiristino kaj sola helpantino. Ŝi pretigas la pli junajn por la lernejo. Mia edzino leviĝas kun mi kaj foriras kun mi. Knabino, kiu preteriras nian domon, vekas min je la kvina kaj duono matene. Ni manĝas nenion, antaŭ ol iri al la laboro. La dekdujara infano zorgas dumtage pri la pli malgrandaj. Ni matenmanĝas je la oka kaj por tio iras hejmen. Ni havas teon unufoje en la semajno; alie ni havas kaĉon (*stirabout*), kelkfoje el avenfaruno, kelkfoje el maizfaruno, laŭ tio ĉu ni kapablas akiri ĝin. Vintre ni havas iomete da sukero kaj akvo por nia maizfaruno. Somere ni rikoltas kelkajn terpomojn, per kiuj ni mem priplantas peceton da tero, kaj kiam ili finiĝis, ni revenas al nia kaĉo. Tiel okazas tagon post tago, dimanĉe kiel labortage, tra la tuta jaro. Mi estas ĉiam tre laca vespere post farita labortago. Esceptokaze ni vidas

252 Saml., p. 21, 13.

iomete da viando, sed tre malofte. Tri el niaj infanoj frekventas lernejon, por kio ni pagas 1 pencon pokape kaj semajne. Nia domluprezo estas 9 pencoj semajne, torfo kaj brulaĵo kostas minimume unu ŝilingon ses pencoj dusemajne."[253]

Jen la irlandaj salajroj, jen irlanda vivo!

Fakte, la mizero de Irlando estas jam ree tagtemo en Anglio. Fine de 1866 kaj komence de 1867, en la *Times* unu el la iraj kamparaj magnatoj, Lord Dufferin, proponis sian solvon. „Kiom humane", diras Mefisto[254], „de tia granda sinjoro!"

El la tabelo D videblis, ke dum 1864 el ĉioma profito de 4.368.610 pundoj tri plusfaristoj enpoŝigis nur 262.819, sed la samaj virtuozoj de „abnegacio" en la jaro 1865 el 4.669.979 pundoj da ĉiomprofito 274.528 pundojn, en 1864: 26 plusfaristoj 646.377 pundojn, en 1865: 28 plusfaristoj 736.448 pundojn, en 1864: 121 plusfaristoj 1.076.912 pundojn, en 1865: 150 plusfaristoj 1.320.906 pundojn, en 1864: 1.131 plusfaristoj 2.150.818 pundojn, preskaŭ la duonon de la jara ĉiomprofito, en 1865: 1.194 plusfaristoj 2.418.833 pundojn, pli ol la duonon de la jara ĉiomprofito. Sed la grandega parto, kiun tre eta nombro da grandaj terproprietuloj en Anglio, Skotlando kaj Irlando voras el la jara nacia rento, estas tiom monstra, ke la saĝo de la angla ŝtato opinias oportune liveri por la dispartigo de la grundrento ne la saman statistikan materialon kiel por la disdivido de la profito. Lord Dufferin estas unu el tiuj grandaj terproprietuloj. Kredi ke grundrentoj, industriaj aŭ komercaj profitoj, interezoj ktp povas neniam esti „ekscesaj" aŭ ke ilia troabundo de riĉaĵo iel rilatas kun la troabundo de la popola mizero, estas kompreneble imago same „malrespekta" kiel „malsana" (*unsound*). Li tenas sin je la faktoj. La fakto estas, ke, kiel la nombro de popolanoj malkreskas, la irlandaj rentoj ŝvelas, ke la senpopoligo estas „bonfara" al la grundproprietuloj, do ankaŭ al la grundo, do ankaŭ al la popolo, kiu estas nur ekipaĵo de la grundo. Li deklaras do, ke Irlando estas daŭre trologâta kaj ke la fluo de elmigrado fluas ankoraŭ tro malvigle. Por esti komplete feliĉa, Irlando devas forcedi ankoraŭ minimume trionan milionon da laboruloj. Oni ne kredu, ke tiu krome eĉ poeta lordo estas kuracisto el la skolo de Sangrado, kiu, kiam li trovis sian malsanulon ne resaniĝanta, dekretis sangellason, denove sangellason, ĝis kiam la paciento perdis kun sia sango ankaŭ sian malsanon. Lordo Dufferin postulas novan sangellason de nur triona miliono, anstataŭ proksimume du milionoj, sen kies foriro la bela jarmilo

253 *„Reports of Insp. of Fact. for 31st Oct. 1866"*, p. 96.

254 La diablo en *Faŭsto*, de Goeto. -vl

en Irlando ne fareblas. Kaj la pruvo estas facile farebla.

*Nombro kaj amplekso de la farmoj en Irlando 1864*[255]

| 1 | | 2 | | 3 | |
|---|---|---|---|---|---|
| **farmoj ne > 1 akreo** | | **farmoj > 1, ne > 5 akreoj** | | **farmoj > 5, ne > 15 akreoj** | |
| **nombro** | **akreoj** | **nombro** | **akreoj** | **nombro** | **akreoj** |
| 40.653 | 25.394 | 82.037 | 288.916 | 176.368 | 1.836.310 |

| 4 | | 5 | | 6 | |
|---|---|---|---|---|---|
| **farmoj > 15, ne > 30 akreoj** | | **farmoj > 30, ne > 50 akreoj** | | **farmoj > 50, ne pli ol 100 akreoj** | |
| **nombro** | **akreoj** | **nombro** | **akreoj** | **nombro** | **akreoj** |
| 136.578 | 3.051.343 | 71.961 | 2.906.274 | 54.347 | 3.983.880 |

| 7 | | 8 |
|---|---|---|
| **farmoj > 100 akreoj** | | **ĉioma surfaco** |
| **nombro** | **akreoj** | **akreoj** |
| 31.927 | 8.277.807 | 20.319.924 |

La centralizado neniigis de 1851 ĝis 1861 ĉefe farmojn de la unuaj tri kategorioj, sub unu kaj ne sub dek kvin akreoj. Antaŭ ĉio devas malaperi ili. Tio rezultigas 307.058 „superfluajn” farmistojn, kaj, se kalkuli la familion je la malalta mezumo de kvar personoj, 1.228.232 homojn. Sub la aŭdaca supozo, ke kvarono da ili post la fino de la kampkultura revolucio estos ree sorbebla, restas por elmigri: 921.174 personoj. La kategorioj 4, 5, 6, de pli ol 15 kaj ne pli ol cent akreoj, estas, kiel oni en Anglio delonge scias, por la kapitalisma grenkulturo tro malgrandaj, sed por ŝafbredado preskaŭ nevideblaj grandoj. Sub la samaj supozoj kiel antaŭe do kromaj 788.761 personoj devas elmigri, sume: 1.709.532. Kaj, ĉar la apetito venas dummanĝe, la okuloj de la rento baldaŭ malkovros, ke Irlando kun 3,5 milionoj estas daŭre mizera, kaj mizera, ĉar trologâta, kaj ke ĝia senpopoligo devas ankoraŭ multe pli progresi, por ke ĝi plenumu sian veran destinon, tiun de angla ŝaf- kaj brut-paŝtejo.[256]

255 La ĉioma surfaco (n-ro 8) inkludas ankaŭ „marĉon kaj neuzatan grundon”.

256 Ke kaj kiel la malsatmizero kaj la cirkonstancoj kaŭzitaj de ĝi estis de la unuopaj grundproprietuloj kaj ankaŭ de la angla leĝdonado sisteme ekspluatataj por perforte trudi la kampkulturan revolucion kaj malpliigi la loĝantaron de Irlando ĝis la mezuro konvena al la grandaj grundproprietuloj, tion mi pruvos pli detale en la libro III de tiu ĉi verko, en la sekcio pri la grundproprieto. Tie mi ankaŭ revenos al la kondiĉoj de la etfarmistoj kaj kamplaboristoj.

Tiu profitiga metodo havas, kiel ĉio bona en tiu ĉi mondo, sian mison. Kun la akumulado de la grundrento en Irlando la akumulado de la irlandanoj okazas sampaŝe. La iro forigita per ŝafo kaj bovo reaperas aliflanke de la oceano kiel Feniano[257]. Kaj fronte al la malnova marreĝino leviĝas pli kaj pli minace la juna giganta respubliko.

*Acerba fata Romanos agunt*

*Scelusque fraternae necis.*

<Akra sorto plagas la romanojn

kaj la krimo de fratomurdo>

---

Ĉi tie nur unu citaĵon. Nassau W. Senior diras i.a. en sia postlasita verko „*Journals, Conversations and Essays relating to Ireland*”, 2 volumoj, Londono, 1868, vol. II, p. 282: „Prave d-ro G. rimarkigis, ke ni havas nian malriĉulleĝon, kaj ĝi estas granda instrumento por doni la venkon al la kamparaj mastroj. Alia estas la elmigrado. Neniu amiko de Irlando povas deziri, ke la milito” (inter la kamparaj mastroj kaj la keltaj etfarmistoj) „daŭru plu – eĉ pli, ke ĝi finiĝu kun la venko de la farmistoj … Ju pli rapide ĝi” (tiu milito) „finiĝas, ju pli rapide Irlando fariĝas paŝtejo (*grazing country*) kun la relative malalta nombro de loĝantaro, kiun paŝtolando bezonas, des pli bone por ĉiuj klasoj.” La anglaj grenleĝoj de 1815 certigis al Irlando la monopolon de libera grenimporto al Britio. Ili do artefarite favoris la grenkulturon. Tiu monopolo estis 1846 per la nuligo de la grenleĝoj subite forigita. Sendepende de ĉiaj aliaj cirkonstancoj, tiu okazaĵo sole sufiĉas por doni fortegan impulson al la transformado de irlandaj kampoj en brutpaŝtejon, al la koncentrado de la farmbienoj kaj al la elpelo de la etkampuloj. Post kiam oni de 1815 ĝis 1846 laŭdis la fekundecon de la irlanda grundo kaj laŭte deklaris, ke ĝi estas de la naturo destinita al tritikkulturo, de tiam la anglaj agronomiistoj, ekonomikistoj kaj politikistoj subite malkovris, ke ĝi taŭgas por nenio alia ol por produktado de verda bestmanĝaĵo! S-ro Léonce de Lavergne urĝe ripetis tion aliflanke de la Kanalo. Necesas „seriozulo” kia Lavergne por lasi sin kapti per tiaj infanaĵoj.

257 Organizaĵo por sendependigo de Irlando. Vd *Vikipedion*. -vl

# *DUDEKKVARA ĈAPITRO La tiel nomata origina akumulado*

## 1. La mistero de la origina akumulado

Ni vidis, kiel oni transformas monon en kapitalon, per kapitalo faras plusvaloron kaj el plusvaloro pli da kapitalo. Tamen la akumulado de la kapitalo premisas la plusvaloron, la plusvaloro la kapitalisman produktadon, sed tiu la ekziston de iom grandaj kvantoj da kapitalo kaj de laborforto en la manoj de varproduktistoj. Tiu tuta moviĝo ŝajnas do turniĝi en erara cirklo, el kiu ni elvenas nur per tio, ke ni supozas „originan akumuladon” (*previous accumulation* ĉe Adam Smith), kiu antaŭas la kapitalisman akumuladon, akumuladon, kiu ne estas rezulto de la kapitalisma produktadmaniero, sed ties ekirpunkto.

Tiu origina akumulado ludas en la politika ekonomio proksimume la saman rolon kiel la prapeko en la teologio. Adamo mordis en la pomon, kaj per tio venis la peko en la homaron. Ĝia origino estas klarigata, per tio ke ĝi estas rakontata kiel anekdoto de la pasinteco. En tempo longe pasinta ekzistis ĉe unu flanko diligenta, inteligenta kaj ĉefe ŝparema elito kaj ĉe la alia flanko pigraj sentaŭguloj, kiuj ĉion fordiboĉis. La legendo pri la teologia prapeko tamen rakontas al ni, kiel la homo estis kondamnita manĝi sian panon en la ŝvito de sia vizaĝo;[258] sed la historio pri la ekonomia prapeko malkaŝas al ni, kial ekzistas homoj, kiuj tute ne bezonas tion. Egale. Tiel okazis, ke la unuaj akumulis riĉaĵon kaj la lastaj fine havis nenion alian por vendi ol sian propran haŭton. Kaj de tiu prapeko datas la malriĉeco de la granda amaso, kiu daŭre, spite al ĉia laboro, havas nenion alian por vendi ol sin mem, kaj la riĉeco de la malmultaj, kiu konstante kreskas, kvankam ili delonge ĉesis labori.

Tian sensspritan infanaĵon oni ne ĉesas gurdi. S-ro Thiers ekzemple kuraĝas ankoraŭ regali per ĝi la francojn, kiuj iam estis tiom spritaj, kaj tion en libro en kiu li pretendas defendi la proprieton kontraŭ la atakoj de la socialismo. Estas vere, ke ekde kiam la demando de proprieto venas en la ludon, ĉiuj havas la sanktan devon defendi tiun rakonton de tiu abocolibro por infanoj, la sola uzebla kaj taŭga por ĉiaj aĝoj.[259]

---

258 Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof […], editoris IKUE kaj KELI, eldonis KAVA-PECH, 1-a eld., Dobřichovice, 2006, p. 8, verso 19: „En la ŝvito de via vizaĝo / vi manĝados panon …” Tie ankaŭ la historio de la „prapeko”. -vl

259 Goeto, tedita de tiaj stultaĵoj, primokas ilin en la sekva dialogo:

„Instruisto: Diru al mi, de kie venis la riĉaĵo de via patro?

En la reala historio ludas la grandan rolon, kiel konate, konkero, subjugado, rabmurdo, mallonge perforto. Male, en la libroj de la milda politika ekonomio regis de ĉiam la idilio. Laŭ ili, neniam ekzistis alia rimedo enriĉiĝi ol la juro kaj la laboro, kun escepto de la kuranta jaro. Fakte, la metodoj de la origina akumulado estas ĉio alia ol idiliaj.

Mono kaj varo ne estas apriore kapitalo, same kiel produktad- kaj viv-rimedoj. Ili bezonas transformadon en kapitalon. Sed tiu transformado mem povas okazi nur sub certaj cirkonstancoj, kiuj kuniĝas jene: Du tre diversaj specoj de varposedantoj devas alpaŝi sin kaj kontaktiĝi inter si, unuflanke proprietuloj de mono, de produktad- kaj viv-rimedoj, kiuj celas plivalorigi sian valorsumon per aĉeto de fremda laborforto; aliflanke liberaj laboristoj, vendantoj de sia propra laborforto kaj do vendantoj de laboro. Liberaj laboristoj en la duobla senco, ke nek ili mem apartenas al la produktadrimedoj, kiel sklavoj, servutuloj ktp, nek ankaŭ la produktad-rimedoj apartenas al ili, kiel ĉe la memmastrumanta terkulturisto ktp, sed ke ili estas liberaj de ili, senaj je ili. Per tiu polusiĝo de la varmerkato la bazaj kondiĉoj de la kapitalisma varproduktado estas donitaj. La kapital-rilato premisas la disiĝon inter la laboristoj kaj la proprieto je la realig-kondicôj de la laboro. Ekde kiam la kapitalisma produktado jam staras sur propraj piedoj, ĝi ne nur konservas tiun disiĝon, sed reproduktas ĝin en ĉiam kreskanta skalo. La procezo, kiu kreas la kapitalrilaton, do povas esti nenio alia ol la disigprocezo de la laboristo disde la proprieto je liaj laborkondiĉoj, procezo, kiu unuflanke transformas la sociajn viv- kaj produktad-rimedojn en kapitalon, aliflanke la rektajn produktistojn en dunglaboristojn. La tiel nomata origina akumulado estas do nenio alia ol la historia disigprocezo de produktanto kaj produktadrimedoj. Ĝi aperas kiel „origina”, ĉar ĝi konsistigas la prahistorion de la kapitalo kaj de la al ĝi kongrua produktadmaniero.

La ekonomia strukutro de la kapitalisma socio devenis el la ekonomia strukturo de la feŭda socio. Ties dissolvo liberigis la elementojn de la kapitalisma socio.

---

Infano: De la avo.

Instruisto: Kaj de li?

Infano: De la praavo.

Instruisto: Kaj de tiu?

Infano: Li prenis ĝin.”

*La lasta paragrafo kaj tiu ĉi piednoto laŭ la franca eldono.* -vl

La rekta produktisto, la laboristo, povis disponi pri sia persono nur post kiam li ĉesis esti ligita al la tero kaj esti servuta al alia persono. Por fariĝi libera vendanto de laborforto, kiu portas sian varon ĉien, kie li trovas merkaton, li devis krome esti eskapinta el la regado de la gildoj, el ties ordoj pri lernantoj kaj submajstroj kaj el la blokantaj laborpreskriboj. Per tio la historia movado, kiu transformas la produktistojn en dunglaboristojn, aperas unuflanke kiel ilia liberigo el servuto kaj gilda trudo; kaj nur tiu flanko ekzistas por niaj burĝaj historiistoj. Sed aliflanke tiuj nove liberigitoj fariĝas vendistoj de si mem nur post kiam oni rabis al ili ĉiajn iliajn produktadrimedojn kaj ĉiajn iliajn garantiojn de ilia ekzistado, kiujn la malnovaj feŭdaj institucioj garantiis. Kaj la historio de tiu ilia senproprietigo estas en la analoj de la homaro enskribitaj per literoj el sango kaj fajro.

La industriaj kapitalistoj, tiuj novaj potenculoj, devis siavice ne nur forŝovi la gildajn metimajstrojn, sed ankaŭ la feŭdajn sinjorojn, kiuj posedis la fontojn de riĉaĵo. El tiu flanko ilia supreniro montriĝas kiel frukto de venka batalo kontraŭ la feŭda potenco kaj kontraŭ ties indignigaj privilegioj kaj kontraŭ la gildoj kaj la obstaklojn kiujn ili metis al la libera disvolvado de la produktado kaj al la libera ekspluatado de la homo fare de la homo. La kavaliroj de la industrio tamen sukcesis forŝovi la kavalirojn de la spado nur per tio, ke ili ekspluatis okazaĵojn pri kiuj ili estis tute senkulpaj. Ili supreniris per rimedoj, kiuj estis same fiaj kiel tiuj, per kiuj iam la roma liberigito faris sin mastro de sia mastro.

La ekirpunkto de tiu evoluo, kiu kreas la dunglaboriston same kiel la kapitaliston, estis la servuto de la laboristo. La evoluo konsistis en formŝanĝo de tiu servuto, en la transformado de la feŭda en kapitalisman ekspluatadon. Por kompreni ĝian iradon, ni tute ne bezonas iri tre malantaŭen. Kvankam la unuaj komencoj de kapitalisma produktado aperis sporade jam en la 14-a kaj 15-a jarcentoj en kelkaj urboj ĉe Mediteraneo, la kapitalisma erao datas nur de la 16-a jarcento. Tie, kie ĝi aperas, la nuligo de servuto estas jam delonge farita kaj la brilo de la mezepoko, la ekzisto de suverenaj urboj, jam de sufiĉa tempo paliĝanta.

Historie epokfaraj en la historio de la origina akumulado estas ĉiuj transformegoj, kiuj servas al la formiĝanta klaso de kapitalistoj kiel levilo; sed precipe la momentoj, en kiuj grandaj homamasoj subite kaj perforte estas deŝirataj de siaj vivrimedoj kaj kiel tute senŝirmaj proletoj ĵetataj sur la labormerkaton. La senproprietigo de la kampara produktisto, de la terkulturisto, je sia grundo konsistigas la bazon de la tuta procezo. Ĝia historio alprenas diversan koloron en diversaj landoj kaj trairas la

diversajn fazojn en diversa vico kaj en diversaj historiaj epokoj. Nur en Anglio ĝi posedas la klasikan formon, kaj pro tio ni prenas ĝin kiel ekzemplon.[260]

## 1.2. Senproprietigo de la kamparanoj je la grundo

En Anglio la servuto estis en la lasta parto de la 14-a jarcento praktike malaperinta. La giganta plimulto de la loĝantaro[261] konsistis tiam kaj ankoraŭ en la 15-a jarcento el liberaj, memmastrumantaj terkulturistoj, kies proprieto troviĝis sub diversaj feŭdaj titoloj. En la grandaj feŭdaj bienoj sur la loko de la iama vokto (*bailiff*) – mem servutulo – troviĝis nun libera farmisto. La dunglaboristoj de kampkulturo konsistis parte el kamparanoj, kiuj valorigis sian libertempon per laboro ĉe grandaj grund-proprietuloj, parte el sendependaj, relative kaj absolute malmultnombran klason de veraj dunglaboristoj. Ankaŭ tiuj estis fakte samtempe mem-mastrumantaj kampuloj, ĉar krom sian salajron ili disponis ankaŭ pri kampoj de kvar aŭ pli da akreoj kune kun kabanoj. Ili krome ĝuis, kune kun la veraj kamparanoj, la fruktuzon de la komunuma tereno, sur kiu ilia brutaro paŝtiĝis kaj kiu provizis ilin samtempe per hejtrimedoj, ligno,

260 En Italio, kie la kapitalisma produktado evoluas plej frue, ankaŭ la dissolviĝo de la servuto okazas plej frue. La servutulo tie emancipiĝas, antaŭ ol certigi al sia ian ajn rajton je la grundo. Lia emancipiĝo transformas lin do tuj en tute liberan proleton, kiu krome en la plej multaj urboj – devenaj jam el la roma epoko – trovas la novajn mastrojn. Kiam la revolucio de la mondmerkato ekde la fino de la 15-a jarcento neniigis la komercan superecon de Italio, estiĝis movado en inversa direkto. La laboristoj de la urboj estis amase pelataj al la kamparo kaj donis tie al la malgranda kulturado, farata laŭ la maniero de ĝardenkulturo, antaŭe ne viditan impeton.

261 „La malgrandaj grundproprietuloj, kiuj prilaboris siajn proprajn kampojn propramane kaj ĝuis modestan prosperon, … konsistigis tiam multe pli gravan parton de la nacio ol nun … Ne malpli ol 160.000 grundproprietuloj, kiuj kun siaj familioj estis certe sepono de la tuta loĝantaro, vivis per mastrumado de siaj malgrandaj *Freehold*- huboj” (*freehold* estas plene libera proprieto). „La mezuma enspezo de tiuj malgrandaj grundproprietuloj … estas taksata je 60 ĝis 70 sterlingaj pundoj. Oni kalkulis, ke la nombro de tiuj, kiuj kulturis sian propran grundproprieton, estis pli granda ol tiu de la farmistoj sur fremda grundo.” (Macaulay, „*Hist. of England*”, 10-a eld., Londono, 1854, I, p. 333-334) – Ankoraŭ en la lasta triono de la 17-a jarcento kvar kvinonoj de la angla loĝantaro estis kampkulturaj (saml., p. 413). – Mi citas Macaulay, ĉar li kiel sistema falsisto de historio kiom eble plej „pritranĉas” tiajn faktojn.

turbo ktp.[262]

En ĉiuj landoj de Eŭropo la feŭda produktado estas karakterizita per divido de la grundo inter kiom eble plej multaj tributuloj. La potenco de la feŭda sinjoro, kiel tiu de ĉia suvereno, baziĝis ne sur la grandeco de sia rento, sed de la nombro de siaj subuloj, kaj tiu dependis de la nombro de memmastrumantaj kamparanoj.[263] Kvankam la angla grundo estis do, post la normanda konkero, dividita en gigantajn baroniojn, el kiuj unu sola inkludis ofte 900 malnovajn anglasaksajn lordiojn, ĝi estis okupata de malgrandaj kampulaj mastrumejoj, ie kaj tie interrompitaj de pli grandaj sinjoraj bienoj. Tiaj kondiĉoj, kun samtempa florado de la urboj, kiujn la 15-a jarcento distingas, ebligis tiun riĉecon de la angla popolo, kiun la kanceliero Fortescue tiom elokvente priskribas en sia „*Laudes legum Angliae*”; sed ĝi ekskludis la eblecon de kapitalisma riĉeco.

La antaŭludo de la transformego, kiu kreis la bazon de la kapitalisma produktadmaniero, okazas en la lasta triono de la 15-a kaj la unuaj jardekoj de la 16-a jarcento. Amaso de tute liberaj proletoj estis ĵetataj en la labormerkaton per la dissolvo de la feŭdaj sekvantaroj, kiuj, kiel Sir James Steuart prave rimarkigas, „ĉie plenigis domon kaj korton”. Kvankam la reĝa potenco, mem produkto de la burĝa evoluo, en sia strebado je absoluta suvereneco, perforte akcelis la dissolvon de tiuj sekvantaroj, ĝi tute ne estis la sola kaŭzo de tiu evoluo. Male, en plej spita kontraŭeco al reĝeco kaj parlamento la granda feŭda sinjoro kreis senkompare pli multnombran proletaron per la perforta forpelo de la kamparanoj el la grundo, pri kiu tiuj posedis la samajn feŭdajn rajtojn kiel li mem, kaj per uzurpado de la komunuma tereno. Por tio, la rektan instigon donis en Anglio la ekflorado de la flandra lanmanufakturo kaj la kun tio ligita kresko de la lanprezoj. La malnova feŭda nobelaro estis forvorita de la feŭdaj militoj, la nova estis ido de sia tempo, por kiu mono estas la

262 Oni neniam forgesu, ke eĉ la servutulo estis ne nur la proprietulo, kvankam tributodeva, de la parceloj apartenantaj al lia domo, sed ankaŭ kunproprietulo de la komunuma tereno. „La kamparano estas tie” (en Silezio, sub Frederiko la dua) „servutulo.” Tamen tiuj servutuloj posedis komunumajn terenojn. „Ĝis nun oni ne povis instigi la silezianojn dividi la komunuman terenon, dum en la *Neumark* [Novmarkio] ekzistas apenaŭ unu vilaĝo, en kiu tiu divido ne fariĝis kun plej granda sukceso.” (Mirabeau: „De la Monarchie Prussienne”, Londono, 1788, vol. II, p. 125, 126)

263 Japanio, kun sia pure feŭda organizo de grundproprieto kaj sia evoluinta ekonomio de etkamparanoj, donas multe pli fidelan bildon de la eŭropa mezepoko ol ĉiuj niaj historiaj libroj, plej ofte diktitaj de burĝaj antaŭjuĝoj. Estas ja tro komforte, esti „liberala” surkoste de la mezepoko.

potenco de ĉiaj potencoj. Transformado de plugebla grundo en ŝafpaŝtejojn estis do la batalkrio. Harrison, en sia „*Description of England. Prefixed to Holinshed's Chronicles*”, priskribas, kiel la senproprietigo de la etkamparanoj ruinigas la landon. „Niaj grandaj uzurpistoj fajfas pri tio!” („*What care our great incroachers?*”) La loĝejoj de la kamparanoj kaj la kabanoj de la laboristoj estis perforte detruitaj aŭ lasitaj al pereo.

> „Se oni volas”, diras Harrison, „kompari la malnovajn inventarojn de ĉiu kavalira bieno, tiam oni trovos, ke sennombraj domoj kaj etaj kamparanaj mastrumejoj malaperis, ke la lando nutras multe malpli da homoj, ke multaj urboj pereis, kvankam kelkaj ie kaj tie prosperas … Pri urboj kaj vilaĝoj, kiujn oni detruis por fari ŝafpaŝtejojn kaj en kiuj jam nur staras la sinjoraj domoj, mi povus rakonti ion.”

La plendoj de tiuj malnovaj kronikoj estas ĉiam troigitaj, sed ili precize skizas la impreson, kiun la revolucio en la produktadkondiĉoj faris al la samtempuloj mem. Komparo inter la skriboj de la kanceliero Fortescue kaj Tomaso Moro[264] montras la abismon inter la 15-a kaj 16-a jarcentoj. El sia ora epoko, kiel Thornton prave diras, la angla laborista klaso falis sen interaj etapoj rekte en la feran.

La leĝdonado ektimegis pro tiu transformego. Ĝi staris ankoraŭ ne sur la alteco de civilizacio, kie „riĉeco de la nacio”, t.e. kapitalestiĝo kaj senrespekta ekspluatado kaj malriĉigo de la popolamaso estas konsiderata la pinto de ĉia ŝtata saĝo. En sia historio de Henriko la 7-a Bako[265] diras:

> „En tiu tempo” (1489) „pliiĝis la plendoj pri la transformado de plugebla grundo en paŝtejon” (por paŝti ŝafojn ktp), „facile prizorgeblan per malmultaj paŝtistoj; kaj farmoj laŭ tempa kontrakto, laŭ vivtempo kaj kun ebleco de jara malkontrakto (per kiuj vivtenis sin granda parto de la *yiomen*) estis transformataj en sinjorajn bienegojn. Tio estigis pereon de la popolo kaj pro tio pereon de urboj, preĝejoj, de la dekonaĵo … En la kuracado de tiu miso la saĝo de la reĝo kaj de la parlamento tiutempe estis mirinda … Ili faris disponojn kontraŭ tiu senpopoliga uzurpado de la komunumaj terenoj (*depopulating inclosures*) kaj kontraŭ la tuj sekvanta senpopoliga paŝtejekonomio (*depopulating pasture*).”

Leĝo de Henriko la 7-a, en 1489, ĉapitro 19, malpermesis la detruadon de ĉiaj kamparanaj domoj, al kiuj apartenis almenaŭ 20 akreoj da grundo. En leĝo 25, Henriko la 8-a, la sama leĝo estas novigita. Tie tekstas i.a., ke

> „multaj farmoj kaj grandaj brutaroj, speciale ŝafoj, amasiĝas en malmultaj

264*Angle: Thomas More*, germane: *Thomas Morus*, hispane: T*omás Moro*.. -vl

265*Angle: Bacon*, germane: *Baco*. -vl

manoj, per kio le grundrentoj tre kreskis kaj la kampkulturo (*tillage*) tre pereis, preĝejoj kaj domoj estis malkonstruitaj, mirindaj popolamasoj mal-kapabligitaj vivteni sin mem kaj siajn familiojn".

La leĝo ordonas do la rekonstruadon de la kadukaj farmdomoj, determinas la proporcion inter grenkampoj kaj paŝtejoj ktp. Leĝo de 1533 plendas, ke kelkaj proprietuloj posedas 24.000 ŝafojn, kaj limigas ties nombron al 2.000.[266] La popola plendado kaj la leĝaro kontraŭ la sen-proprietigo de la malgrandaj farmistoj kaj kamparanoj, kiu ekde Henriko la 7-a daŭris 150 jarojn, estis ambaŭ senfruktaj. La sekreton de ilia mal-sukceso perfidas al ni Bako senscie.

„La leĝo de Henriko la 7-a", diras li en „*Essays, civil and moral*", eseo 29, „estis profunda kaj admirinda, ĉar li kreis normojn por kampkulturaj mastrum-ejoj kaj domoj, t.e. ke ili ricevis proporcion por grundo, kiu kapabligis ilin enmondigi subulojn de sufiĉa riĉeco kaj sen serva situacio kaj teni la plugilon en la mano de proprietuloj, ne de luuloj (*to keep the plough in the hando of the owners and not hirelings*)."[267]

Kion la kapitalisma sistemo bezonis, tio estis, male, la serva situacio de la popolamaso, ĝia propra transformiĝo en dungitojn kaj transformado de iliaj laborrimedoj en kapitalon. Dum tiu transira periodo la leĝdonado provis konservi ankaŭ tiujn kvar akreojn da grundo ĉe la kabano de la kampara dunglaboristo kaj malpermesis al li enpreni lupagantojn en sian

266 En sia „Utopio" [„*Utopia*"], Tomaso Moro parolas pri la stranga lando, kie „ŝafoj voras la homojn". („*Utopia*", *transl. Robinson*, cd. Arber, Londono, 1869, p. 41)

267 Bako klarigas la interligitecon inter libera prospera kamparanaro kaj bona infanterio. „Tio estis mire grava por la potenco kaj teniĝo de la reĝlando, havi farmon de sufiĉa mezuro, por teni bravajn virojn ekster mizero, kaj fikse ligi grandan parton de la grundo de la reĝlando en posedo de la *yeomanry* aŭ de homoj de meza situacio inter nobeloj kaj kabanuloj (*cottagers*) kaj kampuloj … ar estas la ĝenerala opinio de la plej kompetentaj militkonantoj …, ke la ĉefa forto de armeo konsistas en la infanterio aŭ la pieduloj. Sed por starigi bonan infanterion, oni bezonas homojn, kiuj elkreskis ne en serva aŭ mal-abunda maniero, sed libere kaj en certa prospero. Do, se ŝtato brilas ĉefe per nobeloj kaj fajnaj sinjoroj, dum kampuloj kaj plugistoj estas ties nuraj tag-laboristoj aŭ farmservistoj, aŭ kabanuloj, do almozpetantoj kun domo, vi povas havi bonan rajdistaron, sed neniam solidan infanterion … Oni vidas tion en Francio kaj Italio kaj kelkaj aliaj eksteraj regionoj, kie efektive ĉio estas nobelaro aŭ mizera kampularo … tiom, ke ili estas devigataj uzi dungitajn bandojn de svisoj kaj simile por siaj infanteri-batalionoj: tio rezultigas ankaŭ, ke tiuj nacioj havas multe da loĝantoj kaj malmulte da soldatoj." (*The Reign of Henry VII* etc. *Verbatim Reprint from Kennet's England, ed. 1719*", Londono, 1870, p. 308)

kabanon. Ankoraŭ 1627, sub Karlo la 1-a, Roger Crocker de Fontmill estis kondamnita pro konstruado de kabano en la sinjora bieno de Fontmill sen aldoni al ĝi kvar akreojn da tero kiel konstantan aneksaĵon al la kabano; ankoraŭ en 1638, sub Karlo la 1-a, oni nomumis reĝan komisionon por trudi la realigon de la malnovaj leĝoj, nome ankaŭ tiun pri la kvar akreoj da tero; ankoraŭ Kromvelo malpermesis konstruon de domo en regiono de kvar mejloj ĉirkaŭ Londono sen provizi ĝin per kvar akreoj da tero. Ankoraŭ en la unua duono de la 18-a jarcento oni plendis, kiam la kabano de kampara laboristo ne havis apartenaĵon de unu ĝis du akreoj. Nuntempe li estas feliĉa, se ĝi estas provizita per ĝardeneto aŭ se li fore de ĝi povas lui kelkajn kvadratmetrojn.

> „Grundsinjoroj kaj farmistoj", diras d-ro Hunter, „agas ĉi tie man-en-mane. Malmultaj akreoj ĉe la kabano farus la laboriston tro sendependa."[268]

Novan teruran impulson ricevis la perforta procezo de senproprietigo de la popolamaso en la 16-a jarcento per la reformacio kaj, en ties sekvo, la kolosa ŝtelo de la ekleziaj bienoj. La katolika eklezio estis dum la tempo de la reformacio feŭda proprietulo de granda parto de la angla grundo. La forigo de la monaĥejoj ktp ĵetis ties loĝantojn en la proletaron. La ekleziaj bienoj mem estis plej grandparte donacitaj al rabemaj reĝaj favoratoj aŭ venditaj je forĵeta prezo al spekulaciantaj farmistoj kaj urbaj civitanoj, kiuj amase forpelis la malnovajn heredajn tenantojn kaj kunigis ties bienetojn. La leĝe garantiata proprieto de malriĉiĝintaj kamparanoj je parto de la eklezia dekonaĵo estis silente konfiskita.[269] „Malriĉuloj estas ĉie" („*Pauper ubique jacet*"), elkriis la reĝino Elizabeto post rondvojaĝo tra Anglio. En la 43-a jaro de sia reĝado oni estis fine devigata publike agnoski la malriĉecon per enkonduko de la malriĉul-imposto.

> „La kreintoj de tiu leĝo hontis elparoli ĝiajn kaŭzojn kaj do sendis ĝin, kontraŭ ĉia tradicio, sen ajna antaŭparto (enira motivigo) en la mondon."[270]

Per la 4-a leĝo el la 16-a reĝjaro de Karlo la 1-a la parlamento deklaris

---

268 D-ro Hunter, l.c., p. 124. – „La kvanto de lando, kiu" (en la malnovaj leĝoj) „estis atribuita, estus hodiaŭ konsiderata tro granda por laboristoj kaj pli taŭga por transformi ilin en malgrandajn farmistojn." (George Roberts: „*The Social History of the People of the Southern Countries of England in past centuries*", Londono, 1856, p. 184)

269 „La rajto de la malriĉuloj partopreni en la uzo de la eklezia dekonaĵo estas fiksita en malnovaj statutoj." (Tuckett, l.c., vol. II, p. 804, 805)

270 William Cobbett: „*A History of the Protestant Reformation*", § 471.

tiun leĝon eterna, kaj ĝi ricevis nur en 1834 novan, pli akran formon.[271] Tiuj rektaj efikoj de la reformacio ne estis iliaj plej daŭremaj. La eklezia proprieto estis la religia bastiono de la malnovaj proprietrilatoj pri grundo. Kun ties falo ili ne estis pli longe teneblaj.[272]

Ankoraŭ en la lastaj jardekoj de la 17-a jarcento[273] la *yeomanry* – sendependa kamparanaro[274] – estis pli multnombra ol la klaso de farmistoj. Ĝi konsistigis la ĉefan forton de la kromvela angla respubliko kaj estis, eĉ laŭ la konfeso de Macaulay, en avantaĝa kontrasto al la

271 La protestanta „spirito” videblas i.a. el la jeno. En la sudo de Anglio diversaj grundproprietuloj kaj bonstataj farmistoj kunsidis kaj redaktis pri la ĝusta interpreto de la malriĉulleĝo de Elizabeto dek demandojn, kiujn ili prezentis al tiutempe fama juristo, serĝanto Snigge (poste juĝisto sub Jakobo la 1-a), por ekspertizo. „Naŭa demando: Kelkaj el la riĉaj farmistoj de la paroĥo elkovis ruzan planon, per kiu ĉia konfuzo en plenumado de la leĝo forigeblas. Ili proponas la konstruadon de malliberejo en la paroĥo. Al ĉiu malriĉulo, kiu rifuzas eniri tiun malliberejon, oni rifuzos la subtenon. Poste oni sciigos al la ĉirkaŭaĵo ke, se iu individuo deziras lui la malriĉulojn de tiu ĉi paroĥo, li devas submeti, je antaŭe fiksita dato, en sigelita letero, sciigon pri la plej malalta prezo por kiu li volas preni ilin de ni. La proponintoj de tiu plano opinias, ke en la najbaraj distriktoj ekzistas personoj, kiuj ne volas labori kaj estas sen mono aŭ kredito por akiri farmon aŭ ŝipon, por povi vivi senlabore (*so as to live without labour*). Tiuj certe emas fari al la paroĥo avantaĝajn proponojn. Se ie kaj tie mariĉuloj pereas sub la prizorgo de la kontraktinto, la peko kuŝas antaŭ ties pordo, ĉar la paroĥo estus farinta sian devon koncerne tiujn malriĉulojn. Sed ni timas, ke la nuna leĝo ne permesas tian prudentan disponon (*prudential mesure*); sed vi devas scii, ke la resto de la *freeholders* (liberaj tenantoj) de tiu ĉi distrikto aliĝos al ni por instigi la parlamentanojn de la suba ĉambro prezenti leĝon, kiu permesas malliberigon kaj trudlaboron de la malriĉuloj, tiel ke ĉiu persono, kiu rifuzas sian malliberigon, ne rajtu ian ajn subtenon. Tio, kiel ni esperas, detenos personojn en mizero pretendi subtenon (*will prevent persons in distress from wanting relief*).” (R. Blackey: „*The History of Political Literature from the earliest times*”, Londono, 1855, vol. II, p. 84, 85) – En Skotlando la forigo de servuto okazis jarcentojn post tiu en Anglio. Ankoraŭ en 1698 Fletcher de Saltoun deklaris en la skota parlamento: „La nombro de almozuloj en Skotlando estas taksata je ne malpli ol 200.000. La sola rimedo, kiun mi, respublikano de principo, povas proponi, estas, restarigi la malnovan staton de servuto kaj sklavigi ĉiujn kiuj ne kapablas zorgi pri sia propra vivtenado.” Tiel ankaŭ Eden, l.c., vol. I, ĉap. I: „La malriĉeco datas de la libereco de la kamplaboristoj … Manufakturoj kaj komerco estas la veraj gepatroj de niaj naciaj malriĉuloj.” Eden, kiel tiu skota respublikano de principo, eraras nur en tio, ke ne la nuligo de la servuto, sed la nuligo de la proprieto de la kamplaboristo je grundo faris lin proleto respektive malriĉulo. – Al la malriĉulleĝoj de Anglio respondas en Francio, kie la

ebriemaj kampnobeloj kaj iliaj servistoj, la vilaĝaj pastroj, kiuj devis zorgi pri urĝa edzinigo de la „favorata servistino” de la kampara nobelo. Ankoraŭ eĉ la kamparaj dunglaboristoj estis kunposedantoj de la komunuma proprieto. Ĉirkaŭ 1750 la *yeomanry* estis malaperinta,[275] kaj en la lastaj jardekoj de la 18-a jarcento la lasta spuro de komunuma proprieto de la kamparanoj. Ni ne konsideras ĉi tie la pure ekonomiajn kaŭzojn de la kampara revolucio. Ni demandis pri ĝiaj perfortaj leviloj.

Sub la restaŭrado de la dinastio Stuart la grundproprietuloj trudis leĝe uzurpadon, kiu okazis ĉie sur la kontinento ankaŭ sen leĝa favoro. Ili nuligis la feŭdan konstitucion pri grundo, t.e. ili deskuis siajn liverdevojn al la ŝtato, „kompensis” la ŝtaton per impostoj por la kamparanoj kaj por la cetera popolamaso, postulis kiel privatan proprieton, en la moderna senco, pri bienoj, pri kiuj ili posedis nur feŭdan rajton, kaj fine trudis tiujn leĝojn pri ekloĝrajto (*laws of settlement*), kiuj faris el ili apartenaĵon al la paroĥo, same kiel la fama edikto de la tataro Boris Godunov sur la rusa kamparanaro.

La „glora revolucio” („*glorious rovolution*”) entpotencigis kun Vilhelmo la 3-a, princo de Oranio[276] la grundsinjorajn kaj kapitalistajn plus-

senproprietigo okazis alie, la edikto de Moulins, 1566 kaj la edikto de 1656.

272 S-ro Rogers, kvankam tiam profesoro pri politika ekonomio ĉe la universitato de Oksfordo, la prasidejo de la protestanta ortodokseco, emfazas en sia antaŭparolo al la „*History of Agriculture*” [„Historio de la kampkulturo”] la malriĉigon de la popolamaso per la reformacio.

273 *En la franca eld.:* 18-a jarcento. -vl

274 la „*proud peasantry*” de Ŝekspiro. -fr

275 „*A Letter to Sir T. C., Bunbury, Brt.: On the High Price of Provisions. By a Suffolk Gentleman”, Ipswich*, 1795, p. 4. Eĉ la fanatika defendanto de la granda farmsistemo, la aŭtoro [J. Arbuthnot] de la „*Inquiry into the Connection of large farms*” ktp, Londono, 1773, p. 139, diras: „Pleje mi bedaŭras la perdon de nia *yeomanry*, tiu aro de viroj, kiuj en la realo konservis la sendependecon de tiu ĉi nacio; kaj mi bedaŭras vidi iliajn terojn nun en la manoj de monopoligantaj sinjoroj farmigitaj al malgrandaj farmistoj, kiuj tenas siajn farmojn je tiaj kondiĉoj ke ili estas apenaŭ pli ol vasaloj, kiuj ĉe ĉia malbona okazo devas obei ian vokon.”

276 Pri la privata moralo de tiu burĝa heroo vd i.a.: „La grandaj atribuaĵoj de teroj al Lady Orkney en Irlando en la jaro 1695 estas publika pruvo de la simpatio de la reĝo kaj la influo de la Lady … La bonaj kaj lojalaj servoj de Lady Orkney ŝajne konsistis en *foeda laborium ministeria* <malpuraj lipservoj>.” (En la *Sloane Manuscript Collection*, en la Brita Muzeo, n-ro 4224. La manuskripto estas titolita: „*The charakter and behaviour of King William,*

farantojn. Ili inaŭguris la novan eraon per tio, ke ili la ĝis tiam nur modeste faratan ŝteladon je ŝtataj bienoj faris je kolosa skalo. Tiuj teroj estis disdonacitaj, venditaj je ridindaj prezoj aŭ ankaŭ aneksitaj al privataj bienoj per rekta uzurpado.[277] Ĉio ĉi okazis sen la plej eta obeo de leĝa etiketo. La tiom fraŭde alpropriĝita ŝtata bieno kune kun la prirabado de la eklezio, tiom ke ĝi ankoraŭ ne foriĝis dum la respublika revolucio, estas la bazo de la nunaj princaj bienoj de la angla oligarĥio.[278] La burĝaj kapitalistoj favoris tiun operacion, interalie por transformi la grundon en puran komercan artiklon, etendi la zonon de la granda kampkultura entrepreno, pliigi en la urbo sian provizon de liberaj kaj senhavaj proletoj el la kamparo, ktp. Krome la nova grundaristokrataro estis la natura aliancano de la nova bankokratio, de la ĵus eloviĝinta alta financo kaj de la grandaj manufakturistoj, kiuj apogis sin tiam sur protektdoganaĵoj. La angla burĝaro agis por sia intereso tute same ĝuste kiel la svedaj urbaj civitanoj, kiuj inverse, man-en-mane kun sia ekonomia bastiono, la kamparanaro, subtenis la reĝojn perforte reakiri la terojn de la krono el la manoj de la aristokrataro (ekde 1604, poste sub Karlo la 10-a kaj Karlo la 11-a).

La komunuma proprieto – tute malsama ol la ĵus priparolita ŝtatproprieto – estis praĝermana institucio, kiu pluvivis sub la kovrilo de la feŭdeco. Ni vidis, kiel ĝia perforta uzurpado, ofte akompanata de transformado de kampoj en paŝtejojn, fine de la 15-a jarcento komenciĝis kaj en la 16-a jarcento daŭris. Sed tiam la procezo okazis kiel individua perfortaĵo, kontraŭ kiu la leĝaro vane batalis dum 150 jaroj. La progreso de la 18-a jarcento montriĝas en tio, ke la leĝo mem fariĝas nun rimedo de la rabo je popola grundo, kvankam la grandaj farmistoj preterpase ankaŭ uzas siajn etajn sendependaj privat-metodojn.[279] La parlamenta formo de la rabo

*Sunderland etc. as represented in Original letters to the Duke of Shrewsbury from Somers, Halifax, Oxford, Secretary Vernon etc.*" Ĝi estas plena de kuriozaĵoj.)

277 „La kontraŭleĝa forcedo de la kronaj bienoj, parte per vendo kaj parte per donaco, konsistigas skandalan ĉapitron en la angla historio … gigantan fraŭdon pri la nacio (*gigantic fraud on the nation*)." (F. W. Newman: „*Lectures on Political Econ.*", Londono, 1851, p. 129, 130) – {Kiel la hodiaŭaj anglaj grandaj grundproprietuloj akiris sian posedaĵon, detale legeblas en [N. H. Evans:] „*Our old Nobility. By Noblesse Oblige*", Londono, 1879. - F. E.}

278 Vd ekz-e la pamfleton de E. Burke pri la dukoj de Bedford, kies ido estas Lord John Russell, „*the tomtit of liberalism*" <"la birdreĝo de liberalismo">.

279 „La farmistoj malpermesas al la kabananoj teni krom sin mem ian ajn vivan kreaĵon, sub la preteksto, ke, se ili tenas brutojn aŭ kortbirdojn, ili ŝtelus el la bienaj provizejoj manĝaĵon por la bestoj. Ili diras ankaŭ: tenu la kabananojn

estas tiu de la „Leĝoj por enbarado de la komunuma grundo” („*Bills for Inclosures of Commons*”), alivorte dekretoj, per kiuj la grundsinjoroj donacas al si mem popolgrundon kiel privatan proprieton, dekretoj de popola senproprietigo. Sir F. M. Eden refutas sian ruzan advokato-pledon, en kiu li provas prezenti la komunuman proprieton kiel privatan proprieton de la grandaj grundproprietuloj venintaj en la lokon de la feŭdaj, per tio ke li mem postulas „ĝeneralan parlamentan leĝon por enbarado de la komunumaj grundoj”, do koncedas, ke parlamenta ŝtatrenverso por ilia transformado en privatan proprieton necesas, sed aliflanke postulas de la leĝdonantoj „kompensaĵon” por la senproprietigitaj malriĉuloj.[280]

En la sama tempo, kiam la sendependaj *yeomen* estis anstataŭigitaj per *tenants-at-will*, etfarmistoj kies farmkontrakto nuligeblis ĉiujare, servaĉema, timema raso submetita al la kaprico de la grundsinjoroj, – la sistema ŝtelado de la komunumaj grundoj, lige kun la rabado de la ŝtataj bienoj, kontribuis al ŝveliĝo de la grandaj farmoj nomataj en la 18-a jarcento „kapitalfarmoj”[281] aŭ „komercaj farmoj”,[282] kaj „liberigis” la kamparananojn kiel proletaron por la industrio.

Sed la 18-a jarcento ankoraŭ ne sammezure komprenis kiel la 19-a la identecon inter nacia riĉeco kaj popola malriĉeco. Pro tio okazis tiutempe la plej akra polemiko en la ekonomika literaturo pri la „*inclosure of commons*”. Mi citas el la amasa materialo, pri kiu mi disponas, kelkajn malmultajn teksterojn, ĉar per tio vigle ilustriĝas la tiama situacio.

> „En multaj paroĥoj de *Hertfordshire*”, skribas indignita plumo, „24 farmbienoj de mezume 50 ĝis 100 akreoj kunfandiĝis en tri farmbienojn.”[283] „En *Northamtonshire* kaj *Lincolnshire* la enbarado de la komunumaj grundoj tre dominis kaj la plej multaj sinjorejoj naskitaj el tiuj enbaradoj estas transform-

malriĉaj, tiel vi tenas ilin laboremaj. Sed la reala fakto estas, ke la farmistoj tiel uzurpas la tutan rajton je la komunumaj grundoj.” („*A Political Enquiry into the Consequences of Enclosing Waste Lands*”, Londono, 1785, p. 75)

280 Eden, l.c., *Preface*, [p. XVII, XIX]. La leĝoj pri la enbarado de la komunumaj grundoj fariĝas detale tiel, ke laŭ peticio de certaj grundsinjoroj la Malsupra Ĉambro voĉdonas leĝon kiu sankcias la enbaradon en koncerna loko. -fr

281 „*Capital farms” („Two Letters on the Flour Trade and the Dearness of Corn. By a Person in Business*”, Londono, 1767, p. 19, 20)

282 *Merchant-farms. („An Inquiry into the present High Prices of Provisions*”, Londono, 1767, p. 11, noto) Tiun elstare bonan skribaĵon, kiu aperis anonime, verkis la pastro Nathaniel Forster.

283 Thomas Wright: „*A short address to the Public on the Monopoly of large farms*”, 1779, p. 2, 3.

itaj en paŝtejon; pro tio multaj sinjorejoj havas nun eĉ ne 50 akreojn sub la plugilo, kie antaŭe 1.500 estis plugataj … Ruinoj de antaŭaj loĝdomoj, garbejoj, staloj ktp" estas la solaj spuroj de la loĝintoj. „Cent domoj kaj familioj estas kelkloke ŝrumpintaj … al ok aŭ dek … Estas nur tre malmulte da proprietuloj en la plej multaj paroĥoj, kie la enbarado okazis nur antaŭ 15 aŭ 20 jaroj, kompare kun la nombroj da tiuj, kiuj kulturis la grundon kiam ĝi estis malfermita. Ne estas io ekterordinara vidi kvar aŭ kvin riĉajn bestbredistojn uzurpi grandajn, ĵus enbaritajn sinjorejojn, kiuj antaŭe troviĝis en la mano de dudek ĝis tridek farmistoj kaj de same multaj tenantoj kaj etproprietuloj. Ĉiuj ĉi estas kun siaj familioj elĵetitaj el sia posedaĵo apud multaj aliaj familioj, kiuj estis de ili okupataj kaj vivtenataj."[284]

Estis nur nekulturata grundo, sed ofte grundo uzata, per ia pago al la komunumo, aŭ komune uzata grundo, kiu sub la preteksto de enbarado estis aneksita de la apuda grundsinjoro

„Mi parolas ĉi tie pri la enbarado de malfermitaj kampoj kaj terenoj, kiuj estas jam kulturataj. Eĉ la verkistoj, kiuj defendas la enbaradojn, koncedas, ke tiuj pliigas la monopolon de grandaj farmoj, altigas la prezojn de la vivrimedoj kaj produktas senpopoligon … kaj eĉ la enbaradon de neuzataj terenoj, kion oni praktikas nun, rabas al la malriĉuloj parton de iliaj vivrimedoj kaj ŝvelas la farmojn, kiuj estas jam tro grandaj."[285] „Kiam", diras D-ro Price, „la grundo iras en la manojn de kelkaj malpli grandaj farmistoj, la malgrandaj farmistoj" (kiujn li antaŭe nomis „amaso da malgrandaj proprietuloj kaj farmistoj, kiuj vivtenas sin mem kaj siajn familiojn per la produkto de grundo, kiun ili kulturas mem, per ŝafoj, kortbirdoj, porkoj ktp, kiujn ili sendas sur la komunuman terenon, tiel ke ili havas malmultan bezonon aĉeti vivrimedojn") „estas transformataj en homojn, kiuj devas gajni siajn vivrimedojn per laboro por aliuloj kaj estas devigataj iri al la bazaro por ĉio, kion ili bezonas … Eble fariĝas pli da laboro, ĉar ekzistas pli da devigo por tio … Urboj kaj manufakturoj kreskos, ĉar pli da homoj estas pelataj al ili, kiuj serĉas dungon. Jen la vojo, en kiu la koncentriĝo de la farmoj nature efikas kaj en kiu ĝi, de multaj jaroj, en tiu ĉi reĝlando fakte efikis."[286]

Li resumas la tutan evoluon de la enbaradoj jene:

„Ĝenerale la situacio de la malaltaj popolklasoj preskaŭ ĉiurilate malboniĝis, la malgrandaj grundposedantoj estas degraditaj al la stato de taglaboristoj kaj dungitoj; kaj samtempe fariĝis pli malfacile perlabori sian vivon en tiu

284 Rev. Addington: „*Enquiry into the Reasons for or against enclosing open fields*", Londono, 1772, p. 37-43 divl.

285 D-ro R. Price, l.c., vol. II, p. 155, 156. Oni legu Forster, Addington, Kent, Price kaj James Anderson kaj komparu la mizeran jusulaĉan babiladon de MacCulloch en lia katalogo, „The Literature of Political Economy", Londono, 1845.

286 saml., p. 147, 148.

situacio.”[287]

Efektive la uzurpado de la komunuma grundo kaj la ĝin akompananta revolucio de la kampkulturo efikis tiom akre al la kamplaboristoj, ke, laŭ Eden mem, inter 1765 kaj 1780 ilia salajro komencis fali sub la minimumon kaj esti kompletigata per oficiala malriĉul-subteno. Ilia salajro, diras li, „sufiĉis jam nur ĝuste por la absolutaj vivbezonoj”.

Ni aŭdu por momento ankoraŭ defendanton de la enbaradoj kaj kontraŭulon de d-ro Price.

> „Ne estas ĝusta konkludo, ke okazas senpopoligo, ĉar oni jam ne vidas homojn malŝpari sian laboron en malfermita kampo … Se post transformado de etkampuloj en homojn kiuj devas labori por aliuloj, fariĝas pli da laboro, tiam tio estas ja avantaĝo, kiun la nacio” (al kiu la transformitoj kompreneble ne apartenas) „devas deziri … La produkto estos pli granda, se ilia kombinita laboro aplikiĝas al farmo: tiel fariĝas kromprodukto por la manufakturoj, kaj per tio manufakturoj, unu el la orminejoj de tiu ĉi nacio, pliiĝas proporcie al la produktita grenkvanto.”[288]

La animan serenecon, per kiu la politika ekonomikisto rigardas la plej senhontan rompon de la „sankta rajto je proprieto” kaj plej krudan per-

287 Saml., p. 159, 160. Tio memorigas la antikvan Romon. „La riĉuloj estis al si alpropriginta la plej grandan parton de la ne dividitaj terenoj. Ili fidis la tempajn cirkonstancojn, ke tiuj posedaĵoj jam ne estos forprenotaj de ili, kaj pro tio ili aĉetis terpecojn de la malriĉuloj situantajn proksime, parte interkonsente kun ili, parte ili prenis ilin perforte, tiel ke ili kulturis, anstataŭ unuopajn kampojn, nun larĝe etenditajn bienegojn. Ĉe tio ili uzis sklavojn por kampkulturo kaj por bredado, ĉar liberuloj estus forprenitaj de ili, for de la laboro al militservo. La posedo de sklavoj donis al ili profiton ankaŭ, ĉar ili, liberaj de militservo, povis sendanĝere generi idojn kaj efektive ricevis multajn infanojn. Tiel la potenculoj tiris al si ĉian riĉaĵon, kaj en la tuta regiono svarmis la sklavoj. La italoj, male, fariĝis ĉiam mapli nombraj, ĉar ili estis reduktitaj de malriĉeco, impostoj kaj militservo. Kaj eĉ dum tempoj de paco ili estis kondamnitaj al kompleta senaktiveco, ĉar la riĉuloj posedis la grundon kaj uzis por la kampkulturo sklavojn anstataŭ liberulojn.” (*Appian: „Römische Bürgerkriege”* [Apiano: „Romaj internaj militoj”], 1,7) Tiu tekstero rilatas la tempon antaŭ la licinaj leĝoj. La militservo, kiu tiom akcelis la ruiniĝon de la romaj plebanoj, estis ankaŭ ĉefa rimedo, per kiu Karlo la Granda ege akcelis la transformadon de germanaj terkulturistoj en servutulojn.

288 [J. Arbuthnot:] „*An Inquiry into the Connection between the present Prices of Provisions* ktp”, p. 124, 129. Simile, sed kun kontraŭa tendenco: „La laboristoj estas forpelataj el siaj kabanoj kaj devigataj serĉi dungon en la urboj; – sed tiam oni ricevas pli grandan kromaĵon, kaj tiel la kapitalo pliiĝas.” ([R. B. Seeley:] „*The Perils of the Nation*”, 2-a eld., Londono, 1843, p. XIV)

forton kontraŭ personoj, ekde kiam tio necesas por starigi la fundamenton de kapitalisma produktadmaniero, montras al ni interalie Sir F. M. Eden, *tory*-ano kaj „filantropo". La tuta serio da rabaĵoj, teruraĵoj kaj popolpremoj, kiuj akompanas la perfortan senproprietigon de la popolo de la lasta triono de la 15-a jarcento ĝis la fino de la 18-a jarcento, inspiras al li la „komfortan" konkludan penson:

> „Necesis krei la ĝustan (*due*) proporcion inter kamp- kaj brut-tereno. Ankoraŭ en la tuta 14-a kaj la plej granda parto de la 15-a jarcento estis ankoraŭ du, tri kaj eĉ kvar akreoj da kampgrundo kontraŭ unu akreo da paŝtejo. Meze de la 16-a jarcento la proporcio transformiĝis en du akreoj da paŝtejo kontraŭ 2 akreoj da kampo, poste al du akreoj da paŝtejo kontraŭ unu akreo da kampo, ĝis oni fine atingis la ĝustan proporcion de tri akreoj da paŝtejo kontraŭ unu akreo da kampo."

En la 19-a jarcento kompreneble perdiĝis eĉ la memoro pri la intima ligo inter la kampkulturisto kaj la komunuma proprieto; por eĉ ne paroli pri postaj tempoj. Ĉu la kampara popolo eble iam ajn ricevis eĉ nur groŝon por la 3.511.770 akreoj da komunuma grundo, kiuj estis al ĝi rabita inter 1810 kaj 1831 kaj kiun la grundsinjoroj en la parlamento donacis al si reciproke per la enbarigaj leĝoj?

La lasta granda procezo de senproprietigo de la kampkulturistoj je grundo estas la tiel nomata *Clearing of Estates*, laŭvorte maldensigo de bienoj, sed fakte forbalaado de la homoj el ili.[289] Ĉiuj ĝis nun konsideritaj anglaj metodoj kondukis fine al tia „maldensigo". Nun, kie jam ne ekzistas forbalaeblaj sendependaj kamparanoj, kiel videblis en antaŭa sekcio, oni forbalaas iliajn kabanojn, tiel ke la kamplaboristoj sur la grundo kiun ili kulturis, jam eĉ ne trovas la necesan spacon por loĝi. Sed tio, kion „*clearing of estates*" envere signifas, tion ni lernas en la lando de la moderna romanliteraturo, en la alta parto de Skotlando. Tie la fenomeno distingiĝas per sia sistemeco, per sia grandskaleco en kiuj ĝi estas farata (en Irlando grundsinjoroj sukcesis samtempe forbalai plurajn vilaĝojn; en alta Skotlando temas pri surfacoj grandaj kiel germanaj duklandoj) – kaj fine per la aparta formo, per kiu la grundproprieto estis defraŭdata.

La keltoj en alta Skotlando konsistis el klanoj, el kiuj ĉiu estis propriet-

289 *Aldono en la franca eldono:* „En la franca oni diras «maldensigi arbaron», sed «maldensigi bienojn», en la angla senco, ne signifas teĥnikan kampkulturan operacion; ĝi estas la tutaj perfortaĵoj per kiuj oni forigas la kulturistojn kaj iliajn loĝejojn, se ili troviĝas sur bienoj transformataj al granda kampkulturo aŭ al paŝtejo. -vl

ulo de la grundo de ĝi prisetlita. La reprezentanto de la klano, ĝia ĉefo aŭ eminentulo, estis nur titola proprietulo de tiu grundo, tute kiel la reĝino de Anglio estas titola proprietulo de la nacia ĉiomgrundo. Kiam la angla registaro estis sukcesinta definitive subpremi la internajn militojn de tiuj „eminentuloj" kaj iliajn konstantajn rabekspediciojn en la malaltskotajn ebenaĵojn, la klanĉefoj tute ne rezignis sian malnovan rabadon; ili nur ŝanĝis ĝian formon. Per propra aŭtoritato ili transformis sian titolan proprietrajton en privatan proprieton, kaj ĉar ili renkontis rezistadon ĉe la klananoj, ili decidis forpeli tiujn per rekta perforto.

„Reĝo de Anglio povintus samrajte pretendi peli siajn subulojn en la maron",

diris profesoro Newman.[290] Tiu revolucio, kiu en Skotlando komenciĝis post la lasta puĉoprovo de la pretendanto, en siaj unuaj fazoj sekveblas ĉe Sir James Steuart[291] kaj James Anderson[292]. En la 18-a jarcento oni samtempe malpermesis elmigri al la gaeloj forpelitaj el sia grundo, por peli ilin perforte al Glasgovo kaj aliaj fabrikurboj.[293] Por montri la metodon regantan en la 19-a jarcento[294] sufiĉas ĉi tie, kiel ekzemplo, la

290 „*A king of England might as well claim to drive his subjects into the sea*." (F. W. Newman, l.c., p. 132)

291 Steuart diras: „La rento de tiuj teritorioj" (li erare transponas tiun ekonomian kategorion al la tributo de la *taksmen* [vasaloj]al la klanĉefo) „estas tute sensignifa kompare kun ilia amplekso, sed, koncerne la nombron da personoj kiuj ricevas farmon, oni eble trovos, ke peco da grundo en la montaro de Skotlando nutras dekoble pli da homoj ol samvalora grundo en la plej riĉaj provincoj." (saml., vol. I, ĉap. XVI, p. 104)

292 James Anderson: „*Observations on the means of exciting a spirit of National Industry* ktp", Edinburgo, 1777.

293 1860 oni eksportis perforte senproprietigitojn al Kanado sub falsaj promesoj. Kelkaj fuĝis en la montaron kaj najbarajn insulojn. Ili estis persekutataj de policanoj, implikiĝis en bataletojn kun ili kaj eskapis.

294 „En la montaro", diras Buchanan, la komentisto de A. Smith, 1814, „la malnova stato de proprieto estas ĉiutage perforte transformata … La grundsinjoro, sen konsidero al la hereda farmisto" (ankaŭ tio estas ĉi tie erare uzata kategorio) „ofertas la grundon al la plej alta proponanto, kaj se tiu estas pliboniganto (*improver*), li tuj enkondukas novan kultursistemon. La grumdo, antaŭe plena de etkampuloj, estis popolriĉa kompare kun ĝia produkto; sub la nova sistemo de plibonigita kulturo kaj de pli altaj rentoj oni akiras kiom eble plej grandan produkton je kiom eble plej malaltaj kostoj, kaj por tio oni nun forigas la manojn kiuj fariĝis senutilaj … La elĵetitoj el sia hejmlando serĉas vivrimedojn en la fabrikurboj ktp." (David Buchanan: „*Observations on ktp A. Smith's Wealth of Nations*", Edinburgo, 1814, vol. IV, p. 144) „La skotaj granduloj

„maldensigoj” de la grafino de Sutherland. Tiu ekonomie klerigita persono decidis tuj ĉe sia ekregado uzii ekonomie radikalajn rimedojn kaj transformi la tutan distrikton, kies loĝantaro jam per antaŭaj procezoj estis ŝrumpinta al 15.000, en ŝafpaŝtejon. De 1814 ĝis 1820 tiuj 15.000 loĝantoj, proksimume tri mil familioj, estis sisteme forpelataj kaj ekstermataj. Ĉiuj iliaj vilaĝoj estis detruitaj kaj forbruligitaj, ĉiuj iliaj kampoj transformitaj en paŝtejon. Britaj soldatoj, komanditaj por plenumi la elpelon perforte, foje batalis kontraŭ la indiĝenoj. Maljunulino, kiu rifuzis forlasi sian kabanon, pereis en la flamoj. Tiel tiu sinjorino alproprigis al si 794.000 akreojn da grundo, kiu de pratempo apartenis al la klano. Al la forpelitaj indiĝenoj ŝi atribuis proksimume 6.000 akreojn ĉe la marbordo, du akreojn por unu familio. Tiuj ses mil akreoj ĝis tiam estis nekulturitaj kaj ne donis enspezon al la posedintoj. La dukino montris sian larĝanimecon eĉ tiom nobele ke ŝi fermigis tiujn ses mil akreojn, por mezume 2 ŝilingoj 6 pencoj por ĉiu akreo, al la klanuloj, kiuj estis de jarcentoj elverŝintaj sian sangon en la servo de la familio Sutherland. La tutan rabitan klangrundon ŝi dividis en 29 grandajn ŝaffarmojn, ĉiu priloĝata de unu sola familio, plej ofte de anglaj farmservistoj. En la jaro 1825 la 15.000 gaeloj estis jam anstataŭigitaj per 131.000 ŝafoj. La parto de la indiĝenoj ĵetita al la marbordo provis vivteni sin per fiŝkaptado. Ili fariĝis amfibioj kaj vivis, kiel angla verkisto diras, duone sur lando kaj duone sur akvo kaj entute per ambaŭ nur duone.[295]

Sed la bravaj gaeloj devis ankoraŭ pli forte pagi sian mont-romantikan

---

senproprietigis familiojn kvazaŭ ili elsarkus trudherbojn, ili traktis vilaĝojn kaj ilian loĝantaron kiel la hindoj en sia venĝo la kavernojn de sovaĝaj bestioj … La homo estas vendaĉata kontraŭ ŝaf-felo aŭ -femuraĵo, eĉ kontraŭ malpli … Ĉe la invado en la nordajn provincojn de Ĉinio, oni proponis en la konsilio de la mongoloj ekstermi la loĝantojn kaj transformi ilian grundon en paŝtejon. Multaj nobelaj skotaj grundsinjoroj plenumis tion en sia propra lando kontraŭ siaj propraj samlandanoj.” (George Ensor: „*An Inquiry concerning the Population of Nations*”, Londono, 1818, p. 215, 216)

295 Kiam la nuna grafino de Sutherland per granda lukso akceptis en Londono s-inon Beecher-Stowe, la aŭtoron de „La kabano de Onklo Tom” („Uncle Tom’s Cabin”), por montri sian simpation por la nigrulaj sklavoj de la amerika respubliko – kion ŝi, kune kun siaj samaristokratinoj, saĝe evitis dum la interna milito, kiam ĉiu „nobela” angla koro batis por la sklavistoj –, mi prezentis en la *New York Tribune* la situacion de la sklavoj de la familio Sutherland. <MEW, vol. 8, p. 499-505> (Partoj de tiu artikolo troviĝas en Carey: „*The Slave Trade*”, Filadelfio, 1853, p. 202, 203) Mia artikolo estis represita en skota gazeto kaj provokis belan polemikon inter tiu gazeto kaj la subtenantoj de la familio Sutherland.

idoligon de la „eminentuloj” de la klano. La fiŝodoro tiklis la nazon de la eminentuloj. Ili flaris ion profitigan en ĝi kaj forluis la marbordon al la grandaj londonaj fiŝkomercistoj. La gaeloj estis duan fojon forpelitaj.[296]

Sed fine parto de la ŝafpaŝtejoj estas retransformita en ĉasarbaron. Oni scias, ke en Anglio ne ekzistas veraj arbaroj. La ĉasbestoj en la parkoj de la aristokratoj estas laŭkonstitucie dombestoj, grasaj kiel londonaj *alder-men*[297]. Skotlando estas do la lasta azilo de la „nobela pasio”, la ĉasado.

> „En la montaro”, diras Robert Somers en 1848, „oni tre etendis la arbarojn por ĉasbestoj. Ĉi tie ĉe tiu ĉi flanko de *Gaick* vi havas la novan arbaron de *Glenfeshie* kaj tie ĉe la alia flanko la novan arbaron de *Ardverikie*. En la sama linio vi havas la *Bleak-Mount*, gigantan ebenaĵon, nove priplantitan. De oriento al okcidento, de la najbareco de *Aberdeen* ĝis la klifoj de *Oban*, vi havas nun seninterrompan linion de arbaroj, dum en aliaj partoj de la montaro troviĝas la novaj arbaroj de *Loch Archaig*, *Glengarry*, *Glenmoriston* ktp … La transformado de ilia grundo en ŝafpaŝtejon … pelis la gaelojn al senfrukta grundo. Nun cervoj kaj kapreoloj komencas anstataŭi la ŝafojn kaj pelas la gaelojn en ankoraŭ pli preman mizeron … La ĉasarbaroj[298] kaj la popolo ne povas ekzisti apude. Unu aŭ la alia devas ĉiukaze cedi la lokon. Lasu la ĉasejojn laŭ nombro kaj amplekso en la venonta kvaronjarcento kreski kiel en la antaŭa, kaj vi jam ne trovos gaelon sur sia hejma tero. Unuflanke tiu arte-farita sovaĝigo de la montaro okazas pro la modo, la aristokrata orgojlo de la grundsinjoroj kaj ilia pasio por ĉasado, sed aliflanke ili dediĉas sin al komerco de sovaĝbestoj kun ekskluzive profita celo. Ĉar estas fakto, ke peco de mont-ara grundo, transformita en ĉasejon, estas en multaj okazoj senkompare pli profitiga ol ŝafpaŝtejo … La ĉasemulo kiu serĉas ĉasejon limigas sian oferton nur laŭ la amplekso de sia monujo[299] … La skota montaro ricevis suferojn ne malpli kruelajn ol tiuj, per kiuj la politiko de la normandaj reĝoj frapis Ang-lion. Sovaĝaj bestoj ricevis pli liberan spacon, dum la homoj estis pelitaj en pli kaj pli mallarĝan rondon … Unu libereco post la alia estis al ĝi forrabita …

296 Oni trovas ion interesan pri tiu fiŝkomerco en David Urquhart: „*Portfolio, New Series*”. – Nassau W. Senior nomas en sia supre citita postlasita verko „la proceduron en Sutherlandshire kiel unu el la plej bonfaraj maldensigoj (*clearings*) de homa memoro”. (l.c., [p. 282])

297 magistratanoj. -vl

298 La „deer forests” (sovaĝbestaj arbaroj, [laŭvorte: arbaroj de cervoj kaj kapre-oloj]) de Skotlando entenas eĉ ne unu arbon. Oni pelas la ŝafojn for kaj la cervojn alen al la nudajn montojn kaj nomas tion „deer forest”. Do, eĉ ne arbarkulturo!

299 Kaj la monujo de la angla ĉasemulo grandas! Ne nur la aristokratoj luas ĉas-ejojn, ankaŭ iu ajn riĉiĝinto kredas iun M’Callum More nur se tiu komprenig-as ke li havas sian „*lodge*” en la skota montaro. -fr

Kaj la subpremado daŭre kreskas ĉiutage. La proprietuloj praktikas maldensigon kaj forpeladon de la popolo kiel firman principon, kiel kampkulturan neceson, tute same kiel oni forbalaas arbojn kaj arbustojn en la sovaĝaj regionoj de Ameriko aŭ Aŭstralio, kaj tiu operacio iras sian trankvilan, ordinaran iradon."[300]

La rabo de la ekleziaj bienoj, la fraŭda alipropriigo de la ŝtataj bienoj, la ŝtelo de la komunumaj terenoj, la uzurpa kaj kun senkompata terorismo farita transformado de feŭda kaj klana proprieto en modernan privatan proprieton, jen la idiliaj metodoj de la origina akumulado. Ili konkeris la

300 Robert Somers: „*Letters from the Highlands; or, the Famine of 1847*", Londono, 1848, p. 12-28 divl. Tiuj leteroj aperis origine en la *Times*. La anglaj ekonomikistoj klarigis la malsatmizeron de la gaeloj de 1847 kompreneble el ties – superloĝantaro. Ĉiukaze ilia troa nombro „premis" sur la vivrimedoj. – La *clearing of estates* aŭ, kiel oni nomis tion en Germanio, kampulforigo (*Bauernlegen*), kie ĝi okazis precipe post la Tridekjara Milito, kaŭzis ankoraŭ en la jaro 1790 en Elekt-Saksujo kampulribelojn. Ĝi okazis ĉefe en orienta Germanio. En la plej multaj provincoj de Prusujo nur Frederiko la 2-a certigis proprietajn rajtojn al la kamparanoj. Post lia konkero de Silezio li devigis la grundsinjorojn restarigi la kabanojn, grenejojn ktp, provizi la kamparanajn bienojn per brutaro kaj ilaro. Li bezonis soldatojn por sia armeo kaj impostpagantojn por sia ŝtattrezoro. Cetere, oni ne imagu ke la kamparanoj havis agrablan vivon sub lia reĝimo, kiu estis miksaĵo de armea despotismo, de burokrateco, de feŭdismo kaj de financa ĥaoso. Oni legu ekz-e la sekvan citaĵon de la granda Mirabeau, lia admiranto: „Lino estas do unu el la grandaj riĉaĵoj de la kulturisto en norda Germanio. Malbonŝance por la homa specio ĝi estas nur rimedo kontraŭ la mizero, kaj ne rimedo por prospero. La rektaj impostoj, la servutlaboroj kaj ĉiaj trudservoj ruinigas la germanan terkulturiston, des pli ke li devas kunpagi malrektajn impostojn ĉe ĉio kion li aĉetas … kaj, kiel fina ruiniĝo, li ne kuraĝas vendi siajn produktojn tie kaj kiel li volas, li ne kuraĝas aĉeti tion kion li bezonas ĉe la komercistoj kiuj povus liveri ĝin al li plej bonpreze. Ĉiuj ĉi kaŭzoj subfosas lin malrapide sed certe, kaj sen la ŝpinado li ne kapablus pagi la rektajn impostojn je la limdato; ĝi donas al li helpan fonton, kiu utile okupas lian edzinon, liajn infanojn, liajn geservistojn kaj lin mem. Sed malgraŭ tiu helpfonto, kia peniga vivo! Somere li laboras kvazaŭ punlaboristo dum plugado kaj rikoltado; je la 9-a horo li enlitiĝas kaj leviĝas je la 2-a por certigi la finon de siaj laboroj; vintre li devus refreŝigi siajn fortojn per iom longa ripozo; sed mankus al li la greno por pano kaj semado, se li vendus ilin, kion li devus fari por pagi la impostojn. Por ŝtopi tiun truon, li devas do ŝpini … kaj tion kun plej granda insistemo. Tiel la kampulo do vintre enlitiĝas noktomeze kaj leviĝas je la 5-a aŭ la 6-a horo; aŭ li kuŝiĝas je la 9-a kaj leviĝas je la 2-a kaj tiel ĉiujn tagojn de sia vivo, escepte dimanĉon. Tiu troeco de sendormeco kaj de laboro foruzas la homon, kaj tiel okazas, ke en la kamparo geviroj maljuniĝas multe pli frue ol en la urbo." (Mirabeau, l.c., vol. III, p. 212 sj)

kampon por la kapitalisma kampkulturo, enkorpigis la grundon al la kapitalo kaj kreis por la urba industrio la necesan provizadon je libera kaj senposeda proletaro.

---

*Aldono al la 2-a eldono:* En marto <2-a ĝis 4-a eld.: aprilo> 1866, 18 jarojn post la apero de la supre citita verko de Robert Somers, profesoro Leone Levi faris prelegon en la Art-Societo (*Society of Arts*) pri la transformado de la ŝafpaŝtejoj en ĉasejojn, en kiu li priskribas la progreson de la detruoj en la skota montaro. Li diras i.a.: „Senpopoligo kaj transformado en nuran ŝaf-paŝtejon donis la plej komfortan rimedon por enspezo sen elspezo … La ŝanĝo de ŝafpaŝtejo en ĉasejon fariĝis ordinara en la montaro. La ŝafoj estas forpel-ataj de sovaĝaj bestoj, same kiel antaŭe oni forpelis la homojn por cedi ilian lokon al la ŝafoj … Oni povas marŝi de la bienoj de la grafo de Dalhouise en *Forfarshire* ĝis *John o'Groats*, sen iam forlasi la ĉasejon. En multaj" (de tiuj ĉasejoj) „vulpo, sovaĝkato, marteso, putoro, mustelo kaj leporo estas hejmiĝ-intaj, dum kuniklo, sciuro kaj rato trovis sian vojon tien nur antaŭ nelonge. Gigantaj partoj de la lando, kiuj en la statistiko de Skotlando elstaris pro sia fekundeco kaj etendiĝo, estas nun ekskludita de ĉia kulturo kaj plibonigo kaj dediĉitaj sole al la ĉasplezuro de malmultaj personoj – kaj tiu daŭras nur dum mallonga periodo de la laro."

La londona *Economist* de la 2-a de junio 1866 diras: „Skota gazeto raportas lastan semajnon interalie novaĵojn: 'Unu el la plej bonaj ŝaffarmoj en *Sutherlandshire*, por kiu oni lastatempe, ĉe limdato de la kuranta farmkontrakto, ofertis jaran renton de 1.200 sterlingaj pundoj, estas transformata en ĉasejon. Montriĝas la feŭdaj instinktoj … kiel tempe de la normandaj konkerintoj … 36 vilaĝoj detruitaj por krei la *New Forest* … Du milionoj da akreoj, kiuj inkludas kelkajn el la plej fekundaj teritorioj de Skotlando, estas komplete sovaĝigitaj. La natura herbo de *Glen Tilt* estis konsiderata unu el la plej nutraj de la distrikto *Perth*; la ĉasejo de *Ben Aulder* estis la plej bona herbejo en la vasta distrikto de *Badenoch*; parto de la *Black Mount forest* estis la plej bona skota paŝtejo por nigrabuŝaj ŝafoj. Oni povas imagi la vastecon de la grundo sovaĝigita por la ĉasplezuro, se oni konsideras la fakton, ke ĝi estas pli ampleksa ol la tuta distrikto *Perth*. Oni povas pritaksi la perdon de la lando je produktadfontoj pro tiu perforta sovaĝigo per la fakto, ke la grundo de la ĉasejo de *Ben Aulder* povis nutri 15.000 ŝafojn kaj ke ĝi estas nur tridekono de la tuta ĉasejo de Skotlando … Ĉia ĉi ĉasejo estas tute neproduktiva … oni povintus same bone dronigi ĝin en la profundaĵojn de la Norda Maro. La forta mano de la leĝo devus forigi tiujn improvizitajn sovaĝejojn aŭ dezertojn."

# 3. Persekutaj leĝoj kontraŭ la senproprietigitoj ekde la fino de la 15-a jarcento. Leĝo por malaltigo de la salajro

La kreado de tiu libera kaj senposeda proletaro – la forpelitoj el sia grundo – per dissolvo de la feŭda reĝimo kaj per ripeta senproprietigo – okazis pli rapide ol ĝia ensorbiĝo en la naskiĝantaj manufakturoj. Aliflanke la subite el sia kutima vivovojo elĵetitoj ne povis same subite adaptiĝi al la disciplino de sia nova situacio. Ili amase transformiĝis en almozulojn, rabistojn, vagabondojn, parte pro emo, en la plej multaj okazoj per la devigo de la cirkonstancoj. Fine de la 15-a kaj dum la tuta 16-a jarcento ni trovas do en la tuta okcidenta Eŭropo persekutan leĝaron kontraŭ vagabondoj. La patroj de la nuna laborista klaso estis unue punataj pro ilia transformado en vagabondojn kaj mizerulojn. La leĝoj traktis ilin kiel „libervolajn” krimulojn, kvazaŭ dependus de ilia libera volo daŭrigi sian laboron en la jam ne ekzistantaj malnovaj kondiĉoj.

En Anglio tiu leĝaro komenciĝis sub Henriko la 7-a.

Henriko la 8-a, 1530: Maljunaj kaj nelaborkapablaj almozuloj ricevas almozulpermeson. Male, vipado kaj malliberigo por klaraj vagabondoj. Ili estas ligendaj malantaŭe al ĉaro kaj vipendaj ĝis kiam la sango ŝprucu el ilia korpo, poste ili devas ĵuri reveni al sia naskiĝloko aŭ tien, kie ili loĝis dum la lastaj tri jaroj kaj „eklabori” (*to put himself to labour*). Kia kruela ironio! *27 Henriko 8* <Tio signifas leĝo el la 27-a regjaro de Henriko la 8-a. La ĉe la sekvaj indikoj donitaj ciferoj ĉe la dua loko estas la numeroj de la leĝoj deciditaj en la koncerna regjaro> ne nur ripetas tion, sed akrigas la leĝon per novaj aldonoj. Ĉe dua malkovro de vagabondado oni ripetu la vipadon kaj fortranĉu la duonan orelon, sed ĉe tria faro la koncernato estu, kiel krimegulo kaj malamiko de la komunumo, ekzekutenda.

Eduardo la 6-a: Dekreto el lia unua regjaro, 1547, ordonas, ke, se iu rifuzas labori, li estu kiel sklavo atribuita al tiu persono, kiu denuncis lin kiel nenifaranton. La mastro nutru sian sklavon per pano kaj akvo, malforta trinkaĵo kaj tiaj viand-defalaĵoj, kiajn li juĝas taŭgaj. Li havas la rajton per vipado kaj katenado peli lin al ĉia eĉ plej naŭza laboro. Se la sklavo foriras dum 14 tagoj, li estas kondamnita al dumviva sklaveco kaj sur frunto aŭ vangoj brulstampendas per la litero S[301], kaj, se li forkuras trian fojon, ekzekutendas kiel ŝtatperfidulo. La mastro rajtas vendi, heredigi, lui lin same kiel ĉian alian posedaĵon aŭ bruton. Se la sklavoj entre-

301 por angle *slave* (sklavo). -vl

prenas ion kontraŭ siaj mastroj, ili estas ankaŭ ekzekutendaj. Pacjuĝistoj devas laŭ informo persekuti ilin. Se oni malkovras, ke vagabondo dum tri tagoj ne laboris, oni devas porti lin al lia naskiĝloko brulstampi lin per ruĝarda fero sur la brusto per la signo V[302] kaj uzi lin en katenoj sur la strato aŭ por aliaj servoj. Se la vagabondo indikas malĝustan naskiĝlokon, li estu, kiel puno, dumviva sklavo de tiu loko, de ties loĝantoj aŭ korporacio kaj estu brulmarkita per la litero S. Ĉiuj personoj havas la rajton forpreni de la vagabondo ties infanojn kaj teni ilin kiel lernulojn, knabojn ĝis la 24-a jaro, knabinojn ĝis la 20-a jaro. Se ili forkuras, ili estu ĝis tiu aĝo la sklavoj de la instrumastroj, kiuj povas ilin laŭplaĉe kateni, vipi ktp. Ĉiu mastro rajtas meti feran ringon ĉirkaŭ kolo, brakoj aŭ kruroj de sia sklavo, por ke li pli bone konu lin kaj estu pli certa pri li.[303] La lasta parto de tiu dekreto preskribas, ke certaj malriĉuloj estas laborigendaj de tiu vilaĝo aŭ de tiuj individuoj, kiuj manĝigas kaj trinkigas ilin kaj kiuj volas trovi laboron por ili. Tiaj paroĥaj sklavoj konserviĝis ĝis profunde en la 19-a jarcento en Anglio sub la nomo de *roundsmen* (rondirantoj).

Elizabeto, 1572: Almozuloj sen permeso kaj pli ol 14-jaraĝaj estu akre vipendaj kaj brulmarkendaj ĉe la maldekstra orelo, se neniu volas preni ilin kiel servistojn por du jaroj; en kazo de ripeto, kiam pli ol 18-jaraĝaj, ili estu – ekzekutendaj, se neniu volas preni ilin kiel servistojn por du jaroj, sed ĉe tria refaro ili estas senkompate ekzekutendaj kiel ŝtatperfiduloj. Similaj dekretoj: 18 Elizabeto, 13 ĉ. kaj leĝo de 1597.[304]

---

302 laŭ angle *vagabund* (vagabondo). -vl

303 La aŭtoro de la „*Essay on Trade and Commerce*", 1770, rimarkigas: „Ŝajnas, ke sub la regado de Eduardo la 6-a la angloj efektive zorgis tute serioze pri subteno de la manufakturoj kaj laborigo de la malriĉuloj. Ni vidas tion el stranga dekreto, en kiu tekstas, ke ĉiuj vagabondoj brulmarkendas" ktp. (l.c., p. 5)

304 Tomaso Moro [orig. *Thomas More*] diras en sia „Utopio" [*Utopia*, p. 41, 42]: „Tiel okazas, ke avida kaj nesatigebla vorulo, la vera pesto de sia naskiĝlando, povas kunpaki milojn da akreoj de grundo kaj enbari ilin per palisoj aŭ heĝo, aŭ turmentante iliajn proprietulojn per maljustaĵoj kiuj devigas ilin vendi ĉion." Iel aŭ alie, „ili estas devigataj foriri – kompatindaj, simplanimaj mizeruloj! Viroj, virinoj, edzoj, edzinoj, senpatraj infanoj, vidvinoj, lamentantaj patrinoj kun siaj suĉuloj kaj ilia tuta havaĵo, kun malmultaj rimedoj kaj multaj kapoj, ĉar la kampkulturo bezonis multajn manojn. Ili do foriras, el la konata kaj kutima hejmo, sen trovi ian ripozejon; la vendo de ĉio ilia havaĵo, kvankam de ne granda valoro, en aliaj cirkonstancoj povintus iomete helpi; sed ĉar ili estas subite forpelitaj, ili devas ĉion forcedi je ridindaj prezoj. Kaj kiam ili ĉirkaŭvagadis ĝis kiam ilia lasta groŝo estis konsumita, kion alian ili povas fari ol ŝteli kaj poste, je Dio, esti laŭ ĉia formo laŭjure pendumotaj, aŭ almoz-

Jakobo la 1-a: Ĉiu persono, kiu ne havas fiksan laboron kaj almozpetas, estas deklarita vagabondo. La pacjuĝistoj (ĉiuj kompreneble grundproprietuloj, manufakturistoj, pastroj ktp, nomumita por juĝado pri krimoj)[305] en siaj ordinaraj sesioj, rajtas publike vipigi kaj ĉe la unua deliktiĝo enfermi en malliberejon por ses monatoj, ĉe la dua du jarojn. En la malliberejo li estu tiom ofte kaj tiom forte vipota, kiom la pacjuĝistoj juĝas taŭga … La obstinaj kaj danĝeraj vagabondoj estas brulmarkendaj sur la maldekstra ŝultro per *R*[306] kaj metendaj al trudlaboro, kaj se oni ree kaptas ilin ĉe almozpetado, senkompate ekzekutendaj. Tiuj dekretoj, validaj ĝis en la unua tempo de la 18-a jarcento, estis nuligitaj nur en la jaro 1714 (12 Anna ĉ. 23).

En Francio, kie meze de la 17-a jarcento la vagabondoj starigis sian ĉefurbon en Parizo, oni trovas similajn leĝojn. Ĝis la komenco de la regado de Ludoviko la 16-a (dekreto de la 13-a de juio 1777), ĉiu sana kaj bonstatura viro de dek ses ĝis sesdek jaroj trovita sen vivrimedoj kaj sen profesio, estis sendenda al la galeroj. La samo troviĝas en la statuto de Karolo la 5-a por Nederlando, de oktobro 1537, en la unua edikto de la ŝtatoj kaj urboj de Holando de la 19-a de marto 1614, en tiu de la Unuiĝintaj Provincoj de la 25-a de junio 1649, ktp.

Tiamaniere la kampara popolo, perforte senproprietigita je sia grundo, elpelita kaj devigita al vagabondado, estis, per groteske terorismaj leĝoj,

---

peti? Kaj ankaŭ tiam oni ĵetas ilin en malliberejon, kiel vagabondojn, ĉar ili ĉirkaŭvagas kaj ne laboras; ili, kiujn neniu homo volas laborigi, eĉ se ili vigle proponas sin por tio.” El tiuj kompatindaj rifuĝantoj, pri kiuj Tomaso Moro diras, ke oni devigis ilin al ŝtelado, „72.000 grandaj kaj malgrandaj ŝtelintoj estis ekzekutitaj sub la regado de Henriko la 8-a”. (Holinshed: „*Description of England*”, vol. I, p. 186) Dum la regado de Elizabeto „vagabondoj estis laŭ serioj pendumitaj; dume, kutime ne pasis jaro, en kiu ne 300 aŭ 400 en iu aŭ alia loko finiĝis ĉe la pendumilo”. (Strype: „*Annals of the Reformation and Establishment of Religion, and other Various Occurences in the Church of England during Queen Elisabeth’s Happy Reign*”, 2-a eld., 1725, vol. II) Laŭ la sama Strype, en *Somersetshire* en unu sola jaro 40 personoj estis ekzekutitaj, 35 brulmarkitaj, 37 vipitaj kaj 183 „ne plibonigeblaj sentaŭguloj” liberigitaj. Tamen, diras li, „tiu granda nombro de akuzitoj inkludas ne kvinonon de la faritaj krimoj, pro la neglekto de la pacjuĝistoj kaj la stulta kompato de la popolo”. Li aldonas: „La aliaj distriktoj en Anglio estis en ne pli bona situacio ol *Somersetshire* kaj multaj eĉ en pli malbona.” [La dua eldono de 1725 estis ankoraŭ publikigita de la aŭtoro mem. -fr]

305 La teksto inter krampoj laŭ la franca eldono. -vl

306 laŭ la angla *rogue*, fiulo. -fr

per vipado, brulmarkado kaj torturado pretigita por la disciplino necesa por la sistemo de dunglaboro.

Ne sufiĉas, ke la laborkondiĉoj prezentiĝas unuflanke kiel kapitalo kaj aliflanke kiel homoj kiuj havas nenion por vendi ol sian laborforton. Ankaŭ ne sufiĉas devigi ilin vendi sin libervole. En la progreso de la kapitalisma produktado evoluas laborista klaso, kiu pro edukado, tradicio, kutimo agnoskas la postulojn de tiu produktadmaniero kiel memkompreneblajn naturleĝojn. Ekde kiam la kapitalisma produktadprocezo elformiĝis, ĝi rompas ĉian reziston, la konstanta kreado de relativa superloĝantaro tenas la leĝon de propono kaj postulo je laboro kaj do la salajron en la limoj konformaj al la plivalorigaj bezonoj de la kapitalo, la muta devigo de la ekonomiaj kondiĉoj sigelas la regadon de la kapitalisto super la laboristo. Oni ja daŭre uzas ankaŭ eksterekonomian, rektan perforton, sed nur esceptokaze. Por la ordinara irado de la aferoj oni povas konfidi la laboriston al la „naturleĝoj de la produktado”, do al lia dependeco de la kapitalo, dependeco fontanta el la produktadkondiĉoj mem, kiuj garantias kaj eternigas ĝin. Alie statas dum la historia estiĝo de la kapitalisma produktado. La naskiĝanta burĝaro bezonas kaj uzas la ŝtatpotencon por „reguligi” la salajron, do premi ĝin en la limojn taŭgajn por la plusfarado, por plilongigi la labortagon kaj por teni la laboriston mem en normalan gradon de dependeco. Tio estas esenca elemento de la origina akumulado.

La klaso de dunglaboristoj, kiu estiĝis en la lasta duono de la 14-a jarcento, formis tiam kaj en la sekva jarcento nur tre malgrandan parton de la popolo, kiu en sia pozicio estis forte ŝirmata en la kamparo de la sendependaj kamparanoj kaj en la urbo de la korporacia sistemo. Urbe kaj kampare la majstro kaj la laboristo estis socie proksimaj. La submeto de la laboristo sub la kapitalon estis nur formala, do la produktadmaniero mem ankoraŭ ne posedis specife kapitalisman karakteron. La varia elemento de la kapitalo multe pli gravis ol ĝia konstanta. La postulo je dunglaboro kreskis do rapide kun ĉia akumulado de la kapitalo, dum la propono de dunglaboro sekvis nur malrapide. Granda parto de la nacia produkto, poste transformita en akumulad-fonduson, tiutempe ankoraŭ eniris la konsumfonduson de la laboristo.

La leĝdonado pri dunglaboro, dekomence stampita de ekspluatado de la laboristo kaj en sia evoluo ĉiam same malamika al li,[307] komenciĝas en

307„Kiam ajn la leĝdonantoj provas reguligi la malkonsentojn inter entreprenistoj kaj iliaj laboristoj, iliaj konsilantoj estas ĉiam la entreprenistoj”, diras A.

Anglio per la Laboriststatuto (*Statute of Labourers*) de Eduardo la 3-a, en 1349. Al ĝi respondas en Francio la edikto de 1350, farita nome de la reĝo Johano. La angla kaj franca leĝoj estas paralelaj kaj enhave identaj. Pri tio, ke la laborist-statutoj provas trudi plilongigon de la labortago, mi ne revenas al tiu punkto, ĉar mi pritraktis ĝin jam antaŭe (en la 8-a ĉapitro, 5-a paragrafo).

La Laboriststatuto estis decidita laŭ insista plendo de la Malsupra Ĉambro.

> „Antaŭe", diris naive iu *tory*, „la malriĉuloj postulis tiom altan salajron, ke ili minacis la industrion kaj la riĉulojn. Nun ilia salajro estas tiom malalta, ke ĝi ankaŭ minacas la industrion kaj la riĉulojn, sed alie kaj eble pli danĝere ol tiam."[308]

Oni fiksis leĝan salajro-tarifon por urbo kaj kamparo, por popeca kaj por tag-laboro. La kamparaj laboristoj devas dungiĝi por la jaro, la urbaj „en malfermita merkato". Estas malpermesate, je puno de malliberejo, pagi pli ol la laŭstatutan salajron, sed la ricevo de pli alta salajro estas pli forte punata ol ĝia pago. Ekzemple ankoraŭ en la sekcioj 18 kaj 19 de la lernulstatuto de Elizabeto tiu, kiu pagas pli altan salajron, ricevas punon de dektaga malliberejo, sed tiu, kiu prenas ĝin, dudekunutagan. Statuto de 1360 akrigis la punojn kaj eĉ rajtigis la majstron trudi per korpa devigo laboron laŭ la leĝa salajrotarifo. Ĉiaj kombinaĵoj, traktatoj, ĵuroj ktp, per kiuj masonistoj kaj ĉarpentistoj ligis sin reciproke, estis deklaritaj nulaj kaj senvalidaj. Laborista koalicio estas traktata kiel grava krimo ekde la 14-a jarcento ĝis 1825, la jaro en kiu oni nuligis la kontraŭkoaliciajn leĝojn. La spirito de la laboriststatuto de 1349 kaj de ĝiaj posteuloj montriĝas klare en tio, ke ĝi ŝtate diktas ja maksimumon de salajro, sed tute ne minimumon.

En la 16-a jarcento, kiel oni scias, la situacio de la laboristoj estis tre malboniĝinta. La monsalajro kreskis, sed ne proporcie al la malplivalor-iĝo de la mono kaj al la responda kresko de la varprezoj. La salajro falis do fakte. Tamen la leĝoj celantaj malaltigi ĝin restis daŭre validaj, kaj samtempe oni daŭre tranĉis la orelon kaj brulmarkis tiujn, kiujn „neniu volas preni en sian servon". Per la statuto de metilernantoj *5 Elizabeto ĉ. 3* la pacjuĝistoj – kaj, necesas insisti pri tio, ne temas pri juĝistoj en la propra senco de la vorto, sed grundsinjoroj, manufakturistoj, pastroj kaj

Smith. „La spirito de la leĝoj estas la proprieto", diras Linguet.

308 [B. Byles:] „*Sophisms of Free Trade. By a Barrister*", Londono, 1850, p. 206. Li aldonas malice: „Ni ĉiam pretis interveni favore al la aplikanto. Ĉu nenio povas okazi por la aplikato?"

aliaj membroj de la riĉa klaso, kiuj oficas kiel juĝistoj –[309]estis rajtigitaj fiksi certajn salajrojn kaj modifi ilin laŭ sezonoj kaj varprezoj. Jakobo la 1-a etendis tiun laborregulon ankaŭ al teksistoj, ŝpinistoj kaj ĉiaj eblaj laborkategorioj,[310] Georgo la 2-a etendis la leĝojn kontraŭ laboristaj koalicioj al ĉiuj manufakturoj.

En la periodo de la manufakturo en la propra senco la kapitalisma produktadmaniero estis sufiĉe fortiĝinta por fari leĝan reguladon de la salajro same nepraktikebla kiel superflua, sed oni volis, por kazo de bezono, ne rezigni la armilojn de la malnova arsenalo. Ankoraŭ sub Georgo la 2-a la parlamento decidis leĝon (8 George II), kiu malpermesis al la tajloristaj submajstroj en Londono kaj ĉirkaŭaĵo tagsalajron pli altan ol 2 ŝ. $7^1/_2$ pencoj, escepte en kazo de ĝenerala funebro; ankoraŭ sub Georgo la 3-a (13 Geo. III, c. 68) la pacjuĝistoj estas rajtigitaj reguligi la salajron de la silkteksistoj. En 1796 necesis du verdiktoj de la altaj tribunaloj por decidi, ĉu pacjuĝistaj ordonoj pri salajro validas ankaŭ por nekampkulturaj laboristoj; ankoraŭ en la jaro 1799 parlamenta leĝo konfirmis, ke la salajro de la minejlaboristoj de Skotlando estas reguligata de du skotaj leĝoj de 1661 kaj 1671. Sed la kondiĉoj intertempe tiom ŝanĝiĝis, ke jena evento povis okazi en la malsupra ĉambro de la angla parlamento. Tie, kie oni fabrikis leĝojn de pli ol 400 jaroj pri la maksimumo, kiun la salajro nepre ne rajtas superi, Whitbread proponis en la jaro

309 La teksto inter streketoj laŭ la franca eldono. -vl

310 El klaŭzo de la statuto 2 Jakobo la 1-a, ĉ. 6, videblas, ke iuj tolfabrikistoj diktis la salajrotarifon oficiale kiel pacjuĝistoj en siaj propraj laborejoj. – En Germanio precipe post la Tridekjara Milito oftiĝis statutoj por teni la salajron malalta. „La grundproprietuloj en la senhomaj kamparoj suferis mankon de servistoj kaj de laboristoj. Oni malpermesis al ĉiaj vilaĝanoj lui kamerojn al fraŭloj kaj frŭlinoj, ĉiuj tiaj luantoj estis denuncendaj al la instancoj kaj malliberigendaj, se ili ne volis fariĝi servistoj, ankaŭ se ili perlaboris sian vivon per alia laboro, ekz-e semis por la kamparano por tagsalajro aŭ eĉ komercis per mono kaj greno. (*Kaiserliche Privilegien und Sanctiones für Schlesien* [*Imperiestraj privilegioj kaj sankcioj por Silezio]*, vol. I, p. 125) Tra la tuta jarcento en la ordonancoj de la princoj oni amare plendas pri la malica kaj impertinenta kanajlaro, kiu ne volas adaptiĝi al la akraj kondiĉoj kaj kontenti pri la laŭleĝa salajro; oni malpermesas al la individua bienulo pagi pli da salajro ol fiksitan en la teritoria tarifo. Kaj tamen la kondiĉoj de la servo estas post la milito kelkfoje ankoraŭ pli bonaj ol cent jarojn poste. „Ankoraŭ en la jaro 1652 la servistoj en Silezio ricevis dufoje en la semajno viandon, ankoraŭ en nia 19-a jarcento ekzistis tie distriktoj, kie ili ricevis viandon nur trifoje en la jaro. Ankaŭ la tagsalajro estis post la milito pli alta ol en la sekvaj jarcentoj.” (G. Freytag)

1796 por kamparaj taglaboristoj leĝan minimumon de salajro. Pitt kontraŭis tiun disponon, sed koncedis, ke la „situacio de la malriĉuloj estas kruela (*cruel*)”. Fine, en 1813, oni nuligis la leĝojn pri salajra regulado. Ili estis ridinda absurdaĵo, ekde kiam la kapitalisto reguligis la fabrikon per sia privata leĝaro kaj per la malriĉul-imposto igis kompensi la salajron de la kamplaboristo ĝis la nepra minimumo. La disponoj de la laborist-statutoj <3-a kaj 4-a eldono: laborstatutoj> pri kontraktoj inter mastro kaj dunglaboristo, laŭ kiuj, en kazo de rompo de la kontrakto, la civila leĝo aplikeblas nur por la unuaj, dum la krimleĝo por la duaj, plene validas ankoraŭ hodiaŭ.

La kruelaj leĝoj kontraŭ koalicioj falis en la jaro 1825 pro la minaca sinteno de la proletaro. Tamen ili falis nur parte. Kelkaj belaj restaĵoj de la malnovaj statutoj malaperis nur en 1859. Fine la parlamenta leĝo de la 29-a de junio 1871 pretendis forigi la lastajn spurojn de tiu klasa juro per leĝa agnosko de la sindikatoj (*trade-unions*, laboristaj rezistad-societoj)[311]. Sed samdata parlamenta leĝo (*An act to amend the criminal law relating to violence, threats and molestation* <leĝo kompletiganta la krimleĝaron pri perfortaĵoj, minaco kaj ĝeno>) fakte restarigis la antaŭan staton en nova formo. Per tiu parlamenta kaŝludo la rimedoj, kiujn la laboristoj povas uzi ĉe striko aŭ lokaŭto (striko de la aliancitaj fabrikistoj per samtempa fermo de siaj fabrikoj), estas forprenitaj el la ĝenerala juro kaj metita en esceptokazan punleĝaron, kies interpretado estis lasita al la fabrikistoj mem, en ilia eco de pacjuĝistoj. Du jarojn antaŭe la sama malsupra ĉambro kaj la sama s-ro Gladstone laŭ sia konata sincera maniero submetis leĝproponon por forigo de ĉiaj esceptokazaj punleĝoj kontraŭ la laborista klaso. Sed oni ne lasis tion evolui pli ol ĝis la dua legado, kaj tiel oni prokrastis la aferon, ĝis kiam fine la „granda liberala partio”, fortiĝinta per alianco kun la *tories* trovis la kuraĝon decide agi kontraŭ la sama proletaro, kiu estis portinta ĝin al la potenco. Kaj, ne kontenta per tiu perfidaĵo, la „granda liberala partio” permesis al la anglaj juĝistoj, kiuj konstante vostsvingas en la servo de la regantaj klasoj, elfosi la arĥaikajn leĝojn pri „konspiroj” kaj apliki ilin al la laboristaj koalicioj. Oni vidas: nur kontraŭvole kaj sub la premo de la amasoj la angla parlamento rezignis pri la leĝoj kontraŭ strikoj kaj sindikatoj, post kiam ĝi mem, dum kvin jarcentoj, kun la plej senhonta egoismo praktikis la staton de konstanta sindikato de la kapitalistoj kontraŭ la laboristoj.

Tuj komence de la revolucia ŝtormo la franca burĝaro kuraĝis nuligi la rajton je asociiĝo, kiun la laboristoj estis konkerintaj nur ĵus. Per la

311 La teksto inter krampoj -fr.

dekreto de la 14-a de junio 1791 ĝi deklaris ĉian laboristan koalicion „atenco al la libereco kaj al la deklaro de la homrajtoj” kaj punenda je 500 pundoj (*livres*) kun unujara senigo de aktivaj civitanaj rajtoj.[312] Tiu leĝo, kiu ŝtatpolice premas la konkurencbatalon inter kapitalo kaj laboro en barojn komfortajn por la kapitalo, transvivis revoluciojn kaj ŝanĝojn de dinastioj. Eĉ la terorreĝimo lasis ĝin netuŝita. Nur tute lastatempe ĝi estis forstrekita el la punleĝaro. Nenio estas pli karakteriza ol la preteksto de tiu burĝa ŝtatrenverso. „Kvankam estas dezirinde”, diras Le Chapelier, la leĝ-raportisto, kiun Camille Desmoulins kvalifikas kiel „kompatindan harfendulon”[313], „ke la salajro leviĝu pli alten ol ĝi estas nun, por ke tiu, kiu ricevas ĝin, estu ekster la absoluta dependeco kiun produktas la malhavo de la nepraj vivrimedoj kaj kiu estas preskaŭ tiu de sklaveco.” Tamen la laboristoj ne rajtas interkompreniĝi pri siaj interesoj, komune agi kaj per tio moderigi sian „absolutan dependecon, kiu estas preskaŭ sklaveco”, ĉar ili ĝuste per tio lezas „la liberecon de siaj iamaj mastroj kaj nunaj entreprenistoj” (la liberecon teni la laboristojn en la sklaveco!) kaj ĉar koalicio kontraŭ la despoteco de la iamaj mastroj de korporacioj – nu, divenu! – estas starigo de la korporacioj nuligitaj de la franca konstitucio![314]

## 4. Genezo de la kapitalisma produktado

Post rigardi la perfortan kreadon de duoble liberaj, absolute senrajtaj proletoj, la sangan disciplinon, kiu transformas ilin en dunglaboristojn, la fian kampanjon, per kiu la ŝtato politike kaj police kreskigas la ekspluat-gradon de la laboro kaj per tio la akumuladon de la kapitalo, nun restas la

312 La artikolo 1 de tiu leĝo tekstas: „Ĉar la neniigo de ĉiaj korporacioj de samstataj kaj samprofesiaj civitanoj estas unu el la fundamentaj bazoj de la Franca Konstitucio, estas malpermesate restarigi ilin fakte, sub iaj ajn preteksto kaj formo.” La artikolo 4 deklaras: „Se civitanoj ligitaj kun la samaj profesioj, artoj kaj metioj interkonsiliĝus kaj farus interkonsentojn celantajn kune rifuzi la servojn de sia metio aŭ de sia laboro aŭ liveri ilin nur kontraŭ determinita prezo, tiuj interkonsiliĝoj kaj interkonsentoj estas deklaritaj kontraŭkonstitu-ciaj, atencaj al la libereco kaj al la deklaro de la homrajtoj, ktp.”, do krimoj kontraŭ la ŝtato, tute kiel en la malnovaj laborist-statutoj. („*Révolutions de Paris*”, Parizo, 1791, vol. III, p. 523)

313 „*Révolutions de France”* ktp, n-ro LXXVII. -fr

314 Buchez et Roux: „Histoire Parlementaire”, vol. X, p. 193-195.

demando, de kie la kapitalismo origine venis? Ĉar la senproprietigo de la kamparanoj *kreas* rekte nur grandajn grundproprietulojn. Koncerne la genezon de la kapitalisma farmisto, ni povas, por tiel diri, tuŝi ĝin per la mano, ĉar ĝi estas malrapida procezo evoluanta tra multaj jarcentoj. La servutuloj mem, apud ili ankaŭ liberaj malgrandaj grundproprietuloj, troviĝis en tre diversaj proprietrilatoj kaj pro tio estis emancipitaj ankaŭ sub tre diversaj ekonomiaj kondiĉoj.

En Anglio la unua formo de la farmisto estas la mem servuta *bailiff* [elpar. bajlif]. Lia pozicio estas simila al tiu de la anktikva roma *villicus* [elpar.: vílikus], sed en pli strikta agadkampo. Dum la dua duono de la 14-a jarcento li estas anstataŭigata per farmisto, kiun la grundsinjoro provizas per semoj, brutaro kaj kamplabora ilaro. Lia situacio ne estas tre malsama ol tiu de la kamparano. Sed li ekspluatas pli da dunglaboro. Baldaŭ li fariĝas partfarmisto. Li aplikas parton de la kampkultura kapitalo, la grundsinjoro la alian. La du dividas inter si la ĉiomprodukton en kontrakte difinita proporcio. Tiu formo malaperis en Anglio rapide, por cedi la lokon al la vera farmisto, kiu plivalorigas sian propran kapitalon per aplikado de dunglaboristoj kaj kiu pagas al la grundsinjoro parton de la plusprodukto en mono aŭ en naturaĵo kiel grundrenton.

Tiom longe, kiom en la 15-a jarcento la sendependa kamparano kaj la kamplaboristo, kiu apud sia dunglaboro ankaŭ laboras por si mem, riĉigas sin mem per sia laboro, la kondiĉoj de la farmisto kaj lia produktadkampo restas same mezkvalitaj. La kampkultura revolucio en la lasta triono de la 15-a jarcento, kiu daŭris dum preskaŭ la tuta 16-a jarcento (tamen kun la escepto de ĝiaj lastaj jardekoj), riĉigas lin same rapide kiom ĝi malriĉigas la kamparan loĝantaron.[315] La uzurpado de komunumaj paŝtejoj ktp ebligas al li grandan pliigon de la brutaro preskaŭ senkoste, dum la brutaro donas al li abundan sterkon por prilabori la grundon.

En la 16-a jarcento aldoniĝas decide grava elemento. Tiutempe la farmkontraktoj estis longaj, ofte por 99 jaroj. La konstanta valorfalo de la noblaj metaloj kaj do de la mono donis al la farmistoj orajn fruktojn. Ĝi malaltigis la salajron aldone kaj sendepende de la antaŭe konsideritaj cirkonstancoj. Frakcio da ĝi estis uzata por farmprofito. La konstanta kreskado de la prezoj de greno, lano, viando, mallonge de ĉiaj kampkul-

315 „Farmistoj", diras Harrison en sia „*Description of England*", „kiuj antaŭe penis por pagi kvar sterlingajn pundojn da rento, pagas nun 40, 50, 100 pundojn kaj kredas esti farinta malbonan negocon, se ili post fino de la farmkontrakto ne rezervis al si sumon ekvivalentan al la tuta rento pagita dum ses aŭ sep jaroj."

turaj produktoj, ŝveligis la monkapitalon de la farmisto sen lia faro, dum la grundrento, kiun li devis pagi, estis kontraktita en la malnova, pli malalta monvaloro.[316] Tiel li riĉigis sin samtempe surkoste de siaj dunglaboristoj kaj de sia grundsinjoro. Do ne estas mirige, ke Anglio fine de la 16-a jarcento posedis klason de „kapitalfarmistoj” riĉan por la tiamaj kondiĉoj.[317]

---

316 Pri la influo de la malplivaloriĝo de la mono en la 16-a jarcento sur diversaj klasoj de la socio vd: „*A Compendious or Briefe Examination of Certayne Ordinary Complaints of Diverse of our Countrymen in these our Days. By E. S., Gentleman*” (Londono, 1581). La dialogformo de tiu verko kontribuis al tio ke oni longtempe atribuis ĝin al Ŝekspiro kaj ankoraŭ en la jaro 1751 nove eldonis ĝin sub ties nomo. Ĝia aŭtoro estas William Stafford. En iu tekstero la kavaliro (*Knight*) rezonas jene:

*Kavaliro*: „Vi, mia najbaro, la kampulo, vi sinjoro komercisto, kaj vi, kupro-forĝisto, kaj ankaŭ la aliaj metiistoj, vi ja bone scias elturniĝi. Ĉar je tiom, laŭ kiu ĉiuj aĵoj estas pli kostaj ol ili estis, je tiom vi altigas la prezojn de viaj varoj kaj agadoj, kiujn vi ree vendas. Sed ni havas nenion por vendi, kies prezojn ni povus altigi, por krei kompenson por la aĵoj kiujn ni devas siavice aĉeti.” En alia tekstero la *Kavaliro* demandas la *doktoron*: „Mi petas vin, kiuj estas tiuj grupoj da homoj, kiujn vi celas. Kaj, unue, kiuj el ili laŭ via opinio ne havos perdon ĉe tio?” – *Doktoro*: „Mi celas ĉiujn tiujn, kiuj vivas per aĉeto kaj vendo, ĉar multekoste kiel ili aĉetas, ili poste vendas.” – *Kavaliro*: „Kiu estas la alia grupo, kiu, kiel vi diras, gajnos ĉe tio?” – *Doktoro*: „Nu, ĉiuj, kiuj havas farmojn en propra mastrumado (kulturado) je la malnova farmpago, ĉar kie ili pagas laŭ la malnova kvoto, ili vendas laŭ la nova – kio signifas, ke ili pagas malmulte por sia grundo kaj vendas multekoste ĉion kio kreskas sur ĝi …” *Kavaliro*: „Kiu grupo estas tiu, kiu, kiel vi diras, havas ĉe tio pli grandan perdon ol tiuj havas gajnon?” – *Doktoro*: „Ili estas la nobeloj, sinjoroj kaj ĉiuj aliaj, kiuj vivas aŭ per fiksa rento aŭ per stipendio, aŭ kiuj ne mem prilaboras (kulturas) sian grundon, aŭ ne okupiĝas per aĉeto kaj vendo.”

317 Inter la feŭda sinjoro kaj liaj dependuloj je ĉiaj gradoj de vasaleco ekzistis intera aganto, kiu baldaŭ fariĝis aferisto, kaj kies metodo de origina akumulado, same kiel tiu de la financuloj metitaj inter la publika trezoro kaj la borso de la impostpagantoj, konsistis el ĉiaj malversacioj kaj trompadoj. Tiu persono, mastrumanto kaj kolektisto de la kotizoj, impostoj, rentoj kaj iaj ajn produktoj ŝuldataj al la sinjoro, nomiĝis en Anglio *steward* [elpar. stjúet], en Francio *régisseur* [elpar. reĵisér]. Tiu *régisseur* estis kelkfoje mem granda sinjoro. Ekz-e en originala manuskripto publikigita de Monteil legeblas: „Tiu estas la konto, kiun sinjoro Jacques de Thoraine, kastelana kavaliro de Bizon-

## 5. Retroefiko de la kampkultura revolucio al la industrio. Starigo de la interna merkato por la industria kapitalo

La intermita kaj ĉiam novigita senproprietigo kaj forpelo de la kamparanoj liveris, kiel ni vidis, al la urba industrio amasojn kaj ree amasojn da proletoj, kiuj staris tute ekster la korporacia mondo. Jen saĝa cirkonstanco, kiu kredigis al la maljuna A. Anderson (ne konfuzu kun James Anderson) en lia „Historio de la komerco", ke okazis rekta interveno de la Providenco. Ni devas ankoraŭ momenton halti ĉe tiu elemento de la origina akumulado. La maldensigo de la sendependa, memmastrumanta kamparanaro estis ne nur proporcia al la densigo de la industria proletaro, kiel Geoffroy Saint-Hilaire klarigas la densiĝon de la monda materio unuflanke per ĝia maldensiĝo aliflanke.[318] Spite al la malpli granda nombro de ĝiaj kulturistoj, la grundo portis nun kiel antaŭe same aŭ pli da produkto, ĉar la revolucio en la grundproprietaj rilatoj estis akompanata de plibonigitaj metodoj de kulturado, de pli granda kunlaborado, de koncentrado de la produktadrimedoj ktp, kaj ĉar la kampkulturaj

---

tio, donas al la sinjoro, kiu en Diĵono tenas la kontojn por la sinjoro duko kaj grafo de Burgonjo pri la rentoj apartenantaj al tiu kastelejo ekde la 25-a tago de decembro 1359 ĝis la 28-a tago de decembro 1360." (Alexis Monteil: *Traité des matériaux manuscrits* ktp, p. 234) Oni vidas ke en ĉiuj sferoj de la socia vivo la grandega parto venas regule al tiu interulo. En la ekonomia kampo ekz-e, financistoj, borsanoj, bankistoj, negocistoj, komercistoj ktp enpoŝigas la plej grandan parton de la aferoj; en la civila sfero la advokato senmonigas la partiojn sen ilia protesto; en la politiko, la reprezentanto gravas pli ol la elektantoj, la ministro pli ol la suvereno; en la religio, la peranto eklipsas Dion, kaj li estas siavice eklipsata de la pastroj, kiuj estas nepraj perantoj inter la bona pastro kaj liaj ŝafoj.

En Francio, same kiel en Anglio, la grandaj feŭdaj teritorioj estis dividitaj en sennombrajn bienojn, sed en multe pli malfavoraj kondiĉoj por la kulturistoj. La origino de la fermoj aŭ *terriers* [elpar. terié] estis en la 14-a jarcento. Ilia nombro kreskis konstante, al multe pli ol 100.000. Ili pagis grundrenton mone aŭ per naturaĵo, kiu estis parto de la produkto varianta de 12-ono ĝis 5-ono. La *terriers* estis feŭdoj, postfeŭdoj ktp (*fiefs, arrière-fiefs*), laŭ grandeco kaj amplekso de la bienoj, el kiuj kelkaj havis nur la grandon de kelkaj arpentoj [akreoj]. Ĉiuj ĉi *terriers* posedis juran juĝrajton super la loĝantoj en tiuj terenoj, laŭ kvar gradoj. La premo, kiun la kamparanoj suferis sub tiuj etaj tiranoj, estas komprenebla. Monteil diras, ke tiam ekzistis en Francio 160.000 juĝejoj, kie nuntempe sufiĉas 4.000 tribunaloj (inkluzive de la pactribunaloj).

318 En liaj „*Notions de Philosophie Naturelle*", Parizo, 1838.

dunglaboristoj estis ne nur pli streĉe laborigataj,[319] sed ĉar ankaŭ la kampo, sur kiuj ili laboris por si mem, pli kaj pli malgrandiĝis kaj tiel la farmisto pli kaj pli disponis pri ilia tempo de libera laboro.[320] Kun la disponebligita parto de la kamparanoj do ankaŭ ties antaŭaj nutraĵoj estas disponebligitaj.[321] Ili transformiĝis nun en materian elementon de la varia kapitalo. La elpelita kampulo devis nun aĉeti ĝian valoron de sia nova mastro, la industria kapitalisto, en formo de salajro. Kiel pri la vivrimedoj okazis pri la hejma kampkultura krudmaterialo de la industrio. Ĝi transformiĝis en elementon de la konstanta kapitalo.

Ni pensu ekzemple pri parto de la vestfaliaj kamparanoj, kiuj tempe de Frederiko la 2-a ĉiuj ŝpinis linon, kvankam ne silkon, kaj kiuj estis subite senproprietigitaj kaj forpelitaj el la grundo kaj la restanta parto transformita en taglaboristojn de la grandaj farmistoj. La lino aspektas tute same kiel antaŭe. Nenia fibro en ĝi estas ŝanĝita, sed nova socia animo eniĝis en ĝian korpon. Ĝi estas nun parto de la konstanta kapitalo de la manufakturistoj. Antaŭe dividita inter sennombra amaso da etaj produktistoj, kiuj mem kulturis ĝin kaj ŝpinis ĝin kun siaj familioj en malgrandaj porcioj, ĝi estas nun koncentrita en la mano de unu kapitalisto, kiu igas aliulojn ŝpini kaj teksi por li. La kromlaboro, elspezata en la linŝpinejo, antaŭe realiĝis en kromenspezo de sennombraj kampulaj familioj aŭ ankaŭ, dum la tempo de Frederiko la 2-a, en impostojn por la reĝo de Prusio. Ĝi realiĝas nun en profito de malmultaj kapitalistoj. La ŝpiniloj kaj teksiloj, antaŭe disaj tra la tuta lando, estas nun kunigitaj en malmultaj grandaj laborkazernoj, kaj same la laboristoj kaj la krudmaterialo. Kaj ŝpiniloj, teksiloj kaj krudmaterialo estas el rimedoj de sendependa ekzistado por ŝpinistoj kaj teksistoj nun transformitaj en rimedojn por komandi ilin[322] kaj elsuĉi el ili nepagatan laboron. Oni ne vidas ĉe la grandaj manufakturoj kaj ĉe la grandaj farmbienoj, ke ili estis kunigitaj el multaj malgrandaj produktejoj kaj starigitaj per senproprietigo de multaj

---

319 punkto, kiun Sir James Steuart emfazas.

320 Lasta subfrazo -fr

321 En la franca versio tiu frazo tekstas: Tiamaniere la vivrimedoj de granda parto de la kampara loĝantaro fariĝis disponebla kaj samtempe ili kaj ĝi [la vivrimedoj kaj la parto de loĝantaro] devis nun roli kiel materia elemento de la varia kapitalo. -vl

322 „Mi permesos, diras la kapitalisto, ke vi havas la honoron servi al mi, sub la kondiĉo, ke por la peno, kiun mi faras al mi por komandi vin, vi donu al mi la malmulton, kiu restas al vi.” (J. J. Rousseau: „*Discours sur l'Économie Politique*”, [Ĝenevo, 1760, p. 70])

etaj sendependaj produktistoj. Sed la naiva rigardo ne lasas sin trompi. Dum la tempo de Mirabeau, la revolucia leono, la grandaj manufakturoj nomiĝis ankoraŭ „kunigitaj manufakturoj”, kiel oni nun parolas pri „kunigitaj kampoj”. Mirabeau diras:

> „Oni vidas nur la grandajn manufakturojn, kie centoj da homoj laboras sub unu direktoro kaj kiujn oni kutime nomas kunigitaj manufakturoj (*manufactures réunies*). Sed tiuj, en kiuj tre granda nombro da laboristoj laboras ĉiuj dise, kaj ĉiu por sia propra konto, estas apenaŭ konsiderataj; oni metas ilin tute en la fonon. Tio estas tre granda eraro; ĉar nur tiuj konsistigas vere gravan parton de la popolriĉaĵo … La kunigita fabriko (*fabrique réunie*) mire riĉigos unu aŭ du entreprenistojn, sed la laboristoj estos nur pli aŭ malpli bone pagataj taglaboristoj kaj neniel partoprenos en la prospero de la entreprenisto. En la disa fabriko (*fabrique séparée*), male, neniu riĉiĝos, sed multaj laboristoj troviĝos en prospero … La nombro de la diligentaj kaj ŝparemaj laboristoj povos amasigi malgrandan kapitalon, estigi ian resurson por naskiĝo de infano, por malsano, por si mem, aŭ por iu ajn el la siaj. La nombro da ŝparemaj kaj diligentaj laboristoj kreskos, ĉar ili vidos en la bona konduto, en la aktiveco, rimedon esence plibonigi sian situacion, kaj ne akiri etan altigon de salajroj, kiu neniam povas esti grava celo por la estonteco, kaj kies nura efiko estas ke ĝi ebligas al la homoj vivi iomete pli bone, sed nur de tago al tago … La disaj individuaj manufakturoj, plej ofte ligitaj kun malgranda kampkulturo, estas la sole liberaj.”[323]

La senproprietigo kaj elpelo de parto de la kamparanoj, kiuj transformas ilin kaj iliajn viv- kaj labor-rimedojn en materiajn elementojn de la kapitalo, kreas samtempe al tiu ĝian internan merkaton. Antaŭe la kampula familio produktis kaj prilaboris la vivrimedojn kaj krudmaterialojn, kiujn ili poste plejparte mem konsumis. Tiuj krudmaterialoj kaj vivrimedoj fariĝis nun varoj; la grandfarmisto vendas ilin, en la manufakturoj li trovas sian merkaton. Fadeno, tolo, krudaj lanaĵoj, aĵoj kies krudmaterialoj troviĝis en la sfero de ĉia kamparana familio kaj estis de ĝi ŝpinataj kaj teksataj – transformiĝis nun en manufakturajn artiklojn, kies vendmerkaton konsistigis ĝuste la kamparaj distriktoj. La multnombra disa klientaro, ĝis nun kondiĉita de multaj malgrandaj produktistoj, kiuj laboris por sia propra konto, koncentriĝas nun en grandan, de la industria kapitalo provizata merkato.[324]

---

323 Mirabeau, l.c., vol. III, p. 20-109 divl. Se Mirabeau konsideras la disajn laborejojn pli ekonomiaj kaj pli produktivaj ol la „kunigitajn” kaj vidas en la lastaj nur artefaritajn ekzotaĵojn sub helpo de ŝtataj registaroj, tio kompreneblas pro la tiama stato de granda parto de la kontinentaj manufakturoj.

324 „Dudek funtoj da lano trankvile transformataj en la jaran bezonon je vestaĵoj de laborista familio, per ĝia propra diligento en la paŭzoj inter ĝiaj ceteraj

Tiel, man-en-mane kun la senproprietigo de antaŭe memmastrumantaj kampuloj kaj ilia disigo disde iliaj produktadrimedoj okazis la neniigo de la kampara flankindustrio, la disigprocezo de manufakturo kaj kampkulturo. Kaj nur la neniigo de la kampara hejmmetio povas doni al la interna merkato de lando la amplekson kaj firman ekziston, kiun la kapitalisma produktadmaniero bezonas.

Tamen la proprasenca manufakturperiodo ne sukcesis radikalan transformon. Memoru, ke ĝi nur popece trudiĝas al la nacia produktado kaj ĉiam dependas de sia larĝa fono, nome la urba metio kaj de la hejma-kampara flankindustrio. Kiam ĝi neniigas tiun lastan en ia formo, en apartaj branĉoj, en iuj punktoj, tiam ĝi reestigas ĝin en aliaj, ĉar ĝi bezonas ĝin por prilaborado de la krudmaterialo ĝis certa grado. Ĝi do produktas novan klason de malgrandaj kamparanoj, kiuj praktikas la kamplaboradon kiel flankan okupiĝon kaj la industrian laboron por vendo de la produkto al la manufakturo – rekte, aŭ pere de komercisto – kiel ĉefan okupiĝon. Tio estas kaŭzo, kvankam ne la ĉefa kaŭzo, de fenomeno, kiu unue konfuzas la esploriston de la angla historio. Ekde la lasta triono de la 15-a jarcento li trovas konstantan, nur en certaj intervaloj interrompitan plendon pri la kreskanta kapitalekonomio en la kamparo kaj pri la progresanta detruado de la sendependa kamparanaro. Aliflanke li trovas ĉiam denove tiun kamparanaron, kvankam en malpli granda nombro kaj sub ĉiam malboniĝinta formo.[325] La ĉefa kaŭzo estas, ke Anglio dediĉas sin prefere jen al kulturado de grenoj, jen al bestbredado, kaj ĉar tiuj alternaj periodoj ampleksas, la unuaj, duonjarcenton kaj la aliaj apenaŭ dudekon da jaroj, la nombro de etkampuloj, kiuj laboras por sia propra konto, varias ankaŭ konforme al tiuj fluktuadoj.[326]

Nur la granda industrio liveras kun la maŝinoj la konstantan bazon de la kapitalisma kampkulturo, radikale senproprietigas la gigantan plejmulton de la kampara loĝantaro kaj finfaras la disigon inter kampkulturo kaj

---

laboroj – tio ne kaŭzas atenton. Sed aportu la lanon al la merkato, sendu ĝin en la fabrikon, poste al la makleristo, poste al la komercisto, tiam vi elspezis grandajn komercajn operaciojn kaj nominalan kapitalon en la dudekoblo de ĝia valoro … La laborista klaso estas tiel ekspluatata, por konservi mizeriĝintan fabrikloĝantaron, parazitan klason de butikposedantoj kaj fiktivan komerco-, mon- kaj financ-sistemon.” (David Urquhart, l.c., p. 120)

325 Escepto en tio estas la tempo de Kromvelo. Tiom longe, kiom la Respubliko daŭris, la angla popolamaso leviĝis en ĉiuj tavoloj el la degradiĝo, al kiu ĝi estis falinta sub la regado de la Tudor-oj.

326 La lasta frazo laŭ la franca eld. -vl

hejma-kampara metio, kies radikojn ĝi elŝiras – ŝpinado kaj teksado.[327] La granda industrio estas do ankaŭ la unua, kiu konkeras al la industria kapitalo la tutan internan merkaton.[328]

# 6. Genezo de la industriaj kapitalistoj

La genezo de la industria kapitalisto[329] ne okazis en la sama maniero kiel tiu de la farmisto. Sen ajna dubo multaj malgrandaj korporaciaj majstroj kaj eĉ pli multaj malgrandaj metiistoj aŭ ankaŭ dunglaboristoj transformiĝis en malgrandajn kapitalistojn kaj – per iom post iom pli etendita ekspluatado de dunglaboro kaj la responda akumulado – en verajn kapitalistojn. En la infaneca periodo de la kapitalisma produktado ofte okazis kiel en la infaneca periodo de la mezepoka urba socio, kie la demando, kiu el la eskapintaj servutuloj estu majstro kaj kiu servisto, estis grandparte decidita per la pli aŭ malpli frua dato de ilia fuĝo. Tamen la

327 Tuckett scias, ke el la propradiraj manufakturoj kaj el la detruado de la kampara aŭ hejma manufakturo, per enkonduko de la maŝinaro, estiĝas la granda lanindustrio. (Tuckett, l.c., vol. I, p. 139-144) „La plugilo, la jugo estis la invento de dioj kaj la okupiĝo de herooj: ĉu teksilo, ŝpinilo kaj ŝpinrado estas de malpli nobla deveno? Vi disigas la ŝpinradon kaj la plugilon, la ŝpinilon kaj la jugon, kaj ricevas fabrikojn kaj malriĉulejojn, krediton kaj panikojn, du malamikajn naciojn, kampkulturan kaj komercan.” (David Urquhart, l.c., p. 122) Sed nun venas Carey kaj akuzas Anglion, certe ne malprave, ke ĝi strebas transformi ĉiun alian landon en nuran kampkulturan popolon, kies sola fabrikisto estu Anglio. Li asertas, ke tiumaniere Turkio estis ruinigita, ĉar „al la proprietuloj kaj kulturistoj de la grundo estis neniam permesite, de Anglio, fortigi sin mem per la natura alianco inter la plugilo kaj la teksilo, la martelo kaj la erpilo”. („*The Slave Trade*”, p. 125) Laŭ li, Urquhart estas mem unu el la ĉefaj agantoj de la ruiniĝo de Turkio, kie li, en angla intereso, propagandis la doktrinon de liberkomerco. Plej bele estas, ke Carey, cetere granda servisto de la carismo, volas malebligi tiun disig-procezon per la protekto-sistemo, kiu akcelas ĝin.

328 La filantropaj anglaj ekonomikistoj, ekz-e Mill, Rogers, Goldwin Smith, Fawcett ktp, kaj liberalaj fabrikistoj, ekz-e John Bright kaj kompanoj, demandas, kiel Dio Kainon pri ties frato Abelo, la anglan grundaristokraton, kie estas niaj miloj da *freeholders* <liberaj kampuloj>? Sed de kie vi venis mem? El la neniigo de tiuj liberaj kampuloj. Kial vi ne demandas plu, kio okazis al la sendependaj teksistoj, ŝpinistoj, metiistoj?

329 *Industria* ĉi tie en kontrasto al *kampkultura*. En la „kategoria” senco la farmisto estas same industria kapitalisto kiel la fabrikisto.

helika rapido de tiu metodo neniel kongruis kun la komercaj bezonoj de la nova mondmerkato, kiun la malkovroj fine de la 15-a jarcento estis kreintaj. Sed la mezepoko heredigis du diversajn formojn de kapitalo, kiuj maturiĝas en la plej diversaj ekonomiaj sociaj formacioj kaj kiuj, antaŭ la erao de la kapitalisma produktadmaniero, estis sole konsiderataj kiel kapitalo: la uzura kapitalo kaj la komerca kapitalo.

> „Nuntempe” diras angla verkisto, kiu cetere ne konsideras la rolon, kiun ludas la komerca kapitalo[330], „ĉia riĉaĵo de la socio iras unue en la manon de la kapitalisto … tiu pagas al la grundproprietulo la renton, al la laboristo la salajron, al la kolektisto la impostojn kaj la dekonaĵon, kaj retenas grandan, fakte la plej grandan kaj ĉiutage kreskantan parton de la jara laborprodukto por si mem. La kapitalisto konsidereblas nun kiel la unua-mana proprietulo de la tuta socia riĉaĵo, kvankam nenia leĝo transdonis al li la rajton je tiu proprieto … Tiu ŝanĝo de proprieto estis okazigita per la preno de interezo je kapitalo … kaj estas kurioze, ke la leĝdonantoj de tuta Eŭropo volis malebligi tion per leĝoj kontraŭ la uzuro … La potenco de la kapitalisto super ĉia riĉaĵo de la lando estas kompleta revolucio en la proprietrajto, kaj per kia leĝo aŭ per kia serio de leĝoj ĝi estis farita?”[331]

La aŭtoro devintus konscii, ke revolucioj ne fariĝas per leĝoj.

La feŭda konstitucio de la kamparo kaj la gildaj organizoj de la urboj malhelpis la monkapitalon, estigitan per uzuro kaj per komerco, transformiĝi en industrian kapitalon.[332] Tiuj baroj falis kun la dissolviĝo de la feŭdaj societoj, kun la senproprietigo kaj parta elpelo de la kamparanoj. La nova manufakturo estis starigita en maraj eksporthavenoj aŭ en punktoj de la kamparo ekster la kontrolo de la malnova urba reĝimo kaj de ties gilda konstitucio. En Anglio okazis pro tio akra luktado de la korporaciaj urboj kontraŭ tiuj novaj industri-bredejoj. En aliaj landoj, ekzemple en Francio, tiuj estis metitaj sub specialan protekton de la reĝoj.[333]

La malkovro de oro kaj arĝento en Ameriko, la ekstermado, sklavigo kaj laborigo de la indiĝena loĝantaro en minejoj, la ekanta konkerado kaj prirabado de Orient-Hindio, la transformado de Afriko en komercan

---

330 Tiu subfrazo el la franca eld. -vl

331 „*The Natural and Artifical Rights of Property Contrasted*”, Londono, 1832, p. 98, 99. Aŭtoro de la anonima verko: Th. Hodgskin.

332 Eĉ ankoraŭ en 1794 la etaj tolfaristoj de *Leeds* sendis deputitojn al la parlamento por peti leĝon kiu malpermesu al ĉiu komercisto fariĝi fabrikisto. (D-ro Aikin, l.c.)

333 La lasta frazo el la franca eld. -vl

rezervejon por ĉasado de nigrahaŭtuloj, signas la matenruĝon de la erao de kapitalisma produktado. Tiuj idiliaj procezoj estas ĉefaj elementoj de la origina akumulado. Tuj poste sekvas la planedvasta komerca milito de la eŭropaj nacioj. Ĝi komenciĝis per la secesio de Nederlando disde Hispanio, akiris gigantan amplekson en la milito de Anglio kontraŭ la jakobenoj, daŭras ankoraŭ en la opio-militoj kontraŭ Ĉinio ktp.

La diversaj elementoj de la origina akumulado disdiviĝâs nun, pli aŭ malpli en tempa vico, ĉefe al Hispanio, Portugalio, Nederlando, Francio kaj Anglio. En Anglio ili estas fine de la 17-a jarcento sisteme kunigitaj en la kolonia sistemo, sistemo de ŝtataj ŝuldoj, moderna impostsistemo kaj sistemo de doganprotektismo. Tiuj metodoj baziĝas parte sur plej brutala perforto, ekzemple la kolonia sistemo. Sed ĉiuj uzas la ŝtatpotencon, la koncentritan kaj organizitan perforton de la socio, por ege akceli la procezon de transformado de la feŭda en la kapitalisman produktadmanieron kaj por mallongigi la transirojn. La perforto estas la akuŝisto de ĉia malnova socio kiu gravedas je nova. Ĝi mem estas ekonomia potenco.

W. Howitt, homo kiu faras la kristanismon sia specialaĵo, diras pri la kristana kolonia sistemo:

> „La barbaraĵoj kaj fiaj hororaĵoj de la tiel nomataj kristanaj rasoj, en ĉiu regiono de la mondo kaj kontraŭ ĉiu popolo, kiun ili povis subjugigi, trovas nenian paralelon en ia ajn erao de la mondhistorio ĉe ia ajn raso, kiom ajn sovaĝa kaj malklera, senkompata kaj senhonta."[334]

La historio de la nederlanda kolonia ekonomio – kaj Nederlando estis la kapitalisma modela nacio de la 17-a jarcento – „montras nesupereblan pentraĵon de perfido, korupto, murdo kaj fieco".[335] Nenio estas pli karakteriza ol ĝia sistemo de homŝtelo en Celebo, por akiri sklavojn por Javo. La homŝtelistoj estis por tiu celo dresitaj. La ŝtelisto, la buŝtradukisto kaj la vendisto estis la ĉefaj agantoj en tiu komerco, indiĝenaj princoj la ĉefaj vendistoj. La ŝtelita junularo estis kaŝata en la sekretaj malliberejoj de Celebo, ĝis kiam ĝi estis matura por sendi ĝin al la sklavŝipoj. Oficiala raporto diras:

---

334 William Howitt: „*Colonization and Christianity. A Popular History of the Treatment of the Natives by the Europeans in all their Colonies*", Londono, 1838, p. 9. Pri la traktado de la sklavoj ekzistas bona kompilaĵo ĉe Charles Comte: „*Traité de la Législation*", 3-a eld., Bruselo, 1837. Oni devas detale studi tion por vidi, kio la burĝo faras sin mem kaj la laboriston, kie li povas senĝene modli la mondon laŭ sia imago.

335 Thomas Stamford Raffles, *late Lieut. Gov. of that island*: „*The History of Java*", Londono, 1817 [vol. II, p. CXC, CXCI].

> „Tiu ĉi sola urbo Makassar ekz-e estas plena de sekretaj malliberejoj, unu pli horora ol la alia, plenŝtopitaj de mizeruloj, viktimoj de avido kaj de tiraneco, katenigitaj, perforte elŝiritaj el siaj familioj."

Por akapari Malakon, la nederlandanoj koruptis la portugalan guberniestron. En la jaro 1641 li lasis ilin eniri en la urbon. Ili tuj urĝis al lia domo kaj murdis lin, por „rezigni" la pagon de 21.875 sterlingaj pundoj, la prezo de lia perfido. Kien ili metis siajn piedojn, tie sekvis detruado kaj senpopoligo. Provinco de Javo, *Banjuwangi*, nombris en 1750 pli ol 80.000 loĝantojn. En 1811 ĝi havis jam nur 8.000[336]. Jen la dolĉa komerco!

La Angla Orient-Hindia Kompanio ricevis, kiel konate, krom la politikan regadon en Orient-Hindio, la ekskluzivan monopolon de la tekomerco kaj de la komerco kun Ĉinio entute kaj de la vartransporto de kaj al Eŭropo. Sed la marborda ŝipveturado de Hindio kaj inter la insuloj kaj la komerco interne de Hindio fariĝis monopolo de la altaj oficistoj de la kompanio. La monopoloj pri salo, opio, betelo kaj aliaj varoj estis neelĉerpeblaj minejoj de riĉeco. La oficistoj mem fiksis la prezojn kaj laŭplaĉe elpremis la malfeliĉan hindon. La ĝenerala guberniestro partoprenis en tiu privata komerco. Liaj favoratoj ricevis kontraktojn sub kondiĉoj, per kiuj ili, pli saĝaj ol la alĥemiistoj, faris oron el nenio. Grandaj riĉaĵoj naskiĝis kiel fungoj dum unu tago, la origina akumulado okazis sen antaŭpago de nur unu ŝilingo. En la aktoj de la jura persekutado fare de Warren Hastings svarmas tiaj ekzemploj. Jen unu kazo. Kontrakto pri opio estas atribuita al iu Sullivan, en la momento de lia ekvojaĝo – en publika tasko – al parto de Hindio *tute* fora de la opiaj distriktoj. Sullivan vendas sian kontrakton por 40.000 sterlingaj pundoj al iu Binn, Binn vendas ĝin samtage por 60.000 pundoj, kaj la fina aĉetinto kaj plenumanto de la kontrakto deklaras, ke li poste ankoraŭ ricevis gigantan gajnon pere de ĝi. Laŭ listo prezentita al la parlamento, la Kompanio kaj ĝiaj oficistoj igis la hindojn de 1757 ĝis 1766 donaci al ili ses milionojn da sterlingaj pundoj! Inter 1769 kaj 1770 la angloj fabrikis malsatmizeron per la forvendo de ĉia rizo kaj per rifuzo de pluvendado je aliaj ol fabelaj prezoj.[337]

La pritrakto de la indiĝenoj estis kompreneble plej fia en la plantejoj destinitaj nur al eksporta komerco, ekz-e Okcidenta Hindio, kaj en la riĉaj

336 En la angla versio: 18.000 (la franca kaj hispana kiel la germana). -vl

337 En la jaro 1866 en la sola provinco Oriso mortis pli ol miliono da hindoj pro malsato. Tamen oni strebis riĉigi la hindan ŝtatkason per la altaj prezoj, je kiuj oni cedis vivrimedojn al la malsatmortantoj.

kaj dense priloĝataj landoj elmetitaj al rabmurdo, kiel Meksiko kaj Orient-Hindio. Sed ankaŭ en la veraj kolonioj la kristaneco de la origina akumulado ne malkonfesis sin. Tiuj sobraj virtuozoj de protestantismo, la puritanoj de Nov-Anglio, per decidoj de sia asembleo en 1703, elmetis premion de 40 sterlingaj pundoj por ĉia indiana skalpo kaj por ĉia kaptita ruĝhaŭtulo, en la jaro 1720 premion de cent pundoj por ĉiu skalpo, en 1744, post kiam *Massachusetts-Bay* deklaris iun tribon ribela, jenajn premiojn: por skalpo de viro 12-jara aŭ pli aĝa 100 sterlingaj pundoj de nova valuto, por viraj kaptitoj 105 pundoj, por kaptitaj virinoj kaj infanoj 50 pundoj, por skalpoj de virinoj kaj infanoj 50 pundoj! Kelkajn jardekojn poste la kolonia sistemo venĝis sin kontraŭ la posteuloj de tiuj piaj pilgrimintoj (*pilgrim fathers*), kiuj intertempe fariĝis siavice ribeluloj. Laŭ angla instigo kaj angla pago ili estis tomahokataj. La brita parlamento deklaris spurhundojn kaj skalpadon „rimedoj, kiujn Dio kaj la naturo donis en ĝian manon”.

La kolonia sistemo kvazaŭ forceje maturigis komercon kaj ŝipveturadon. La „monopol-societoj” (laŭ Lutero) estis potencaj leviloj de la kapitalkoncentriĝo. La kolonio certigis al la ek-svarmantaj manufakturoj la vendmerkaton kaj akumuladon potencigitan per la merkata monopolo. La trezoro predita ekster Eŭropo per rabado, sklavigo kaj rabmurdo fluis en la metropolon kaj tie transformiĝis en kapitalon. Nederlando, kiu la unua komplete disvolvis la kolonian sistemon, atingis jam en la jaro 1648 la apogeon de sia komerca grando. Ĝi estis

> „en preskaŭ ekskluziva posedo de la orienthindiaj komerco kaj trafiko inter la eŭropaj sudokcidento kaj nordoriento. Ĝiaj fiŝkaptado, marveturado, manufakturoj superis tiujn de ĉia alia lando. La kapitaloj de la respubliko estis eble pli grandaj ol tiuj de la tuta cetera Eŭropo.”

Gülich forgesas aldoni: La popolamaso de Nederlando estis jam en 1648 pli trolaboranta, pli malriĉiĝinta kaj pli brutale subpremata ol tiu de la tuta cetera Eŭropo.

Nuntempe industria supereco iras kun komerca supereco. En la periodo de vera manufakturo, male, la komerca supereco donas la industrian superecon. Estis „la fremda dio”, kiu metis sin apud la malnovaj idoloj de Eŭropo sur la altaron kaj iun belan tagon per puŝo de kubuto renversis ilin ĉiujn. Ĝi proklamis la plusfaradon lasta kaj sola celo de la homaro.

La sistemo de publika kredito, t.e. de la ŝtatŝuldoj, kies originojn ni malkovras en Ĝenovo kaj Venecio jam en la mezepoko, akaparis la tutan Eŭropon dum la manufaktura periodo. La kolonia sistemo kun sia mar-

komerco kaj siaj komercaj militoj servis al ĝi kvazaŭ forcejo. Tiel ĝi unue fiksiĝis en Nederlando. La ŝtatŝuldo, alivorte la forcedo de la ŝtato – ĉu despota, konstitucia aŭ respublika – metas sian stampon al la kapitalisma erao. La sola parto de la tiel nomata nacia riĉaĵo, kiu reale eniras la ĉioman posedon de la modernaj popoloj, estas – ĝia ŝtatŝuldo.[338] Pro tio la moderna doktrino estas tute konsekvenca, ke popolo fariĝas des pli riĉa, ju pli profunde ĝi enŝuldiĝas. La publika kredito fariĝas la kredo de la kapitalo. Kaj kun la estiĝo de la ŝtatŝuldiĝo, sur la lokon de la peko kontraŭ la sankta spirito, por kiu ne estas pardono, iras la malfido je la ŝtatŝuldo.

La publika ŝuldo fariĝas unu el la plej energiaj leviloj de la origina akumulado. Kvazaŭ per frapo de sorĉbastono ĝi kapabligas la neprodukt-ivan monon je generforto kaj transformas ĝin tiel en kapitalon, sen ke ĝi bezonus elmeti sin al la penado kaj danĝero, kiuj estas nedisigeblaj disde industria kaj eĉ uzura investo. La ŝtatkreditoroj donas en la realo nenion, ĉar la pruntita sumo estas transformata en publikajn facile transigeblajn ŝuldkuponojn, kiuj daŭre funkcias en iliaj manoj, kvazaŭ ili estus same multa kontanta mono. Sed, aparte de la tiel kreita klaso de nenifarantaj rentuloj kaj de la improvizita riĉaĵo de la financistoj, kiuj agas inter la registaro kaj la nacio kiel perantoj – kaj ankaŭ aparte de impostfarmistoj, komercistoj, privataj fabrikistoj, al kiuj bona peco da ĉia ŝtatprunto servas kiel kapitalo falinta el la ĉielo – la ŝtatŝuldo prosperigis la akci-societojn, la komercon per negoceblaj paperoj, la spekuladon, per unu vorto: la borsan akci-ludon kaj la modernan bankokration.

Ekde sia naskiĝo la grandaj bankoj, beligitaj per naciaj titoloj, estis nur societoj de privataj spekulistoj, kiuj metis sin flanke de la registaroj kaj, pro la ricevitaj privilegioj, kapablis prunti al ili monon. Pro tio la aku-mulado de la ŝtatŝuldo ne havas pli senmankan gradmezurilon ol la sinsekvan kreskon de la akcioj de tiuj bankoj, kies plena disvolviĝo datas de la fondo de la Banko de Anglio (1694). La Banko de Anglio komencis prunti al la registaro sian monon je 8 procentoj; samtempe ĝi estis de la parlamento rajtigita stampi monon el la sama kapitalo, per tio ke ĝi ree pruntis ĝin al la publiko en formo de bankbiletoj. Tiujn bankbiletojn ĝi rajtis uzi por diskonti kambiojn, prunte antaŭpagi varojn kaj aĉeti noblajn metalojn. Ne daŭris longe ĝis kiam tiu de ĝi mem fabrikita kreditmono fariĝis la mono, per kiu la Banko de Anglio faris pruntojn al la ŝtato kaj pagis, por konto de la ŝtato, la interezojn de la publika ŝuldo. Ne sufiĉe,

338 William Cobbett rimarkigas, ke en Anglio ĉiuj publikaj institucioj estas nomataj „reĝaj”, sed kompense ekzistis la „nacia” ŝuldo (*national debt*).

ke ĝi donis per unu mano por ricevi pli per la alia mano; ĝi restis ankaŭ, dum ĝi ricevadis, eterna kreditoro de la nacio ĝis la lasta donita groŝo. Iom post iom ĝi fariĝis neeviteble la ujo de la metaltrezoroj de la lando kaj la gravita centro de la tuta komerca kredito. Dum la sama tempo, en kiu oni en Anglio ĉesis bruligi sorĉistinojn, oni tie komencis pendumi falsintojn de bankbiletoj. La skribaĵoj de tiu tempo, ekz-e tiuj de Bolingbroke, montras la efekton, kiun al la samptempuloj faris la subita apero de tiu ularo de bankokratoj, financistoj, rentuloj, makleristoj, akciservistoj kaj borsaj lupoj.[339]

Kun la publikaj ŝuldoj naskiĝis internacia kreditsistemo, kiu ofte kaŝas unu el la fontoj de la origina akumulado ĉe iu aŭ alia popolo. Tiel ekzemple la veneciaj raboj kaj perfortaĵoj fariĝas unu el tiaj kaŝitaj bazoj de la kapital-riĉeco de Nederlando, al kiu la kadukiĝanta Venecio pruntis grandajn monsumojn. Same okazis inter Nederlando kaj Anglio. Jam komence de la 18-a jarcento la manufakturoj de Nederlando estas larĝe superitaj kaj ĝi ĉesis esti dominanta komerca kaj industria nacio. Unu el ĝiaj ĉefaj aferoj de 1701 ĝis 1776 fariĝis do la pruntedonado de gigantaj kapitaloj, speciale al sia potenca konkurencanto Anglio. Io simila okazas hodiaŭ inter Anglio kaj Usono. Ne malmulte da kapitalo, kiu hodiaŭ aperas en Usono sen naskiĝdokumento, estas sango de fabrikinfanoj nur hieraŭ en Anglio kapitaligita.

Ĉar la ŝtatŝuldo havas sian garantion en la ŝtatenspezoj, kiuj devas kovri la ĉiujarajn pagojn de interezoj ktp, la moderna impostsistemo fariĝis la necesa kompletigo de la sistemo de naciaj pruntoj. La pruntoj kapabligas la registaron pagi eksterordinarajn elspezojn, sen ke la impostpaganto tuj sentas tion, sed ili tamen en la sekvo necesigas plialtigon de la impostoj. Aliflanke la impostaltigo, kaŭzita de akumulado de sinsekve kontraktitaj ŝuldoj, devigas la registaron, ĉe novaj eksterordinaraj elspezoj ĉiam preni novajn pruntojn. La moderna impostsistemo, kies centro estas la impostoj pri la plej necesaj vivrimedoj (do ties prezaltigo), portas do en si mem la ĝermon de aŭtomata progreso. La troimpostado ne estas incidento, sed principo. Pro tio, en Nederlando, kie tiu sistemo estis unue enkondukita, la granda patrioto de Witt celebris ĝin en siaj „Maksimoj" kiel la plej bonan sistemon por fari la dunglaboriston submetiĝema, modesta, diligenta kaj … superŝarĝita de laboro. La detrua influo, kiun ĝi faras al la situacio de la dunglaboristoj, koncernas nin ĉi tie tamen malpli

339 „Se la tataroj hodiaŭ inundus Eŭropon, oni malfacile komprenigus al ili, kio estas financisto ĉe ni." (Montesquieu: „*Esprit des lois*", vol. IV, p. 33, eld. Londono, 1769)

ol la de ĝi kaŭzita senproprietigo de la kamparanoj, de la metiisto, mallonge de ĉiaj elementoj de la malalta meza klaso. Pri tio ne ekzistas du opinioj, eĉ ne ĉe la burĝaj ekonomikistoj. Ĝia senproprietiga efikeco estas fortigata ankoraŭ per la sistemo de dogana protektismo, kiu estas unu el ĝiaj konsistigaj partoj.

La granda rolo, kiun la publika ŝuldo kaj la kun ĝi kongrua impostsistemo ludis en la kapitaligo de la riĉaĵo kaj en la senproprietigo de la amasoj, instigis multajn verkistojn, ekz-e Cobbett, Boubleday kaj aliajn, malprave serĉi en ĝi la bazan kaŭzon de la mizero de la modernaj popoloj.

La protektisma sistemo estis artefarita rimedo por fabriki fabrikistojn, senproprietigi sendependajn laboristojn, kapitaligi la naciajn produktad- kaj viv-rimedojn, perforte mallongigi la transiron el la antikva en la modernan produktadmanieron. La eŭropaj ŝtatoj kverelis por la patento de tiu invento, kaj post kiam ĝi eniris en la servon de la plusfaristoj, ili prirabis por tio ne nur la propran popolon, malrekte per protekt-doganaĵoj, rekte per eksport-premioj ktp. En la dependaj apudlandoj oni elradikigis ĉian industrion perforte, kiel ekz-e la irlandan lanmanufakturon fare de Anglio. Sur la eŭropa kontinento, post la ekzemplo de Colbert, oni multe simpligis la procezon. La origina kapitalo de la industriisto tie fluas parte rekte el la ŝtattrezoro.

> „Kial”, elkrias Mirabeau, „serĉi la kaŭzon de la manufaktura brilo de Saksujo tiom longe antaŭ la Sepjara Milito? 180 milionoj da ŝtatŝuldoj!”[340]

Kolonisistemo, ŝtatŝuldoj, impostefiko, protektismo, komercaj militoj ktp, tiuj idoj de la vera manufakturperiodo, gigante ŝvelas dum la infaneca periodo de la granda industrio. Ties naskiĝo estas festata per la granda heroda infanrabo. Kiel la reĝa ŝiparo, la fabrikoj rekrutiĝas – pere de la gazetaro! Kiom ajn Sir F. M. Eden orgojlas pri la hororaĵoj de la senproprietigo de la kamparanoj el ilia grundo ekde la lasta triono de la 15-a jarcento ĝis sia tempo, la fino de la 18-a jarcento, kiom ajn memplaĉe li gratulas je tiu procezo, „necesa” por starigi la kapitalisman kampkulturon kaj „la veran proporcion de kampo kaj paŝtejo”, li, male, ne montras la saman komprenon pri la neceso de la infanrabo kaj de la infansklavigo por transformi la manufaktursistemon en la fabriksistemon kaj por la starigo de la vera rilato inter kapitalo kaj laborforto. Li diras:

> „Eble valoras la penon ke la publiko pritaksu, ĉu ia ajn manufakturo, kiu por

340 „Pourquoi aller chercher si loin la cause de l’éclat manufacturier de la Saxe avant la guerre? Cent quatre-vingt millions de dettes faites par les souverains!” (Mirabeau, l.c., vol. VI, p. 101)

sia sukcesa plenumado devas prirabi malriĉajn infanojn el kabanoj kaj labordomoj, por ke ili, en grupa alternado, dum la plej granda parto de la nokto estu per laboro prirabataj je sia ripozo, kiu, kvankam nepra por ĉiuj, estas plej necesa por junuloj; kaj ke multaj el ambaŭ seksoj, de diversaj aĝoj kaj dispozicioj, estas kunigitaj tiel, ke la kontaĝo de la ekzemplo devas konduki al malvirto kaj diboĉo – ĉu tia manufakturo povas pliigi la sumon de la nacia kaj individua feliĉo?"[341] „En *Derbyshire*, *Nottinghamshire* kaj speciale en *Lancashire*", diras Fielden, „la ĵus inventita maŝinaro estis aplikata en grandaj fabrikoj, proksime de riveregoj kapablaj turni la akvoradon. Miloj da manoj estis subite necesaj en tiuj lokoj, malproksime de la urboj; kaj nome *Lancashire*, ĝis tiam relative maldense priloĝata kaj malfekunda, bezonis nun loĝantaron pli ol aliaj. Precipe la etaj kaj rapidaj fingroj estis serĉataj. Tuj estiĝis la kutimo venigi metilernantojn (!) el la diversaj paroĥaj labordomoj de Londono, Birminghamo kaj de aliloke. Multaj, multaj miloj da tiuj etaj senhelpaj kreaĵoj , de la 7-a ĝis la 13-a aŭ 14-a vivojaro, estis tiel senditaj norden. La mastro" (do, la infanŝtelisto) „havis la kutimon vesti, nutri kaj loĝigi siajn lernantojn en lernantodomo proksime de la fabriko. Oni komisiis prigardantojn, kiuj kontrolis ilian laboron. La intereso de tiuj sklavpelistoj estis ekstreme laborigi la infanojn, ĉar ilia pago estis en proporcio al la kvanto de produktoj elpremebla el la infano. Krueleco estis natura sekvo … En multaj fabrikdistriktoj, speciale en *Lancashire*, oni aplikis la plej korŝirajn torturojn al tiuj senkulpaj kaj senamikaj kreaĵoj, kiuj estis liveritaj al la fabrikmastroj. Ili estis ĝismorte pelataj per eksceso de laboro … ili estis travipataj, katenigataj kaj torturataj per la plej rafinitaj metodoj; en multaj okazoj ili estis malsatigitaj ĝis la ostoj, dum la vipo tenis ilin ĉe la laboro … Ja, en kelkaj okazoj ili estis pelataj al memmortigo! … La belaj kaj romantikaj valoj de *Derbyshire*, *Nottinghamshire* kaj *Lancashire*, fermitaj al la publika okulo, fariĝis kruela soleco de torturo kaj – ofte de murdo! … La profitoj de la fabrikistoj estis eksterordinaraj. Tio nur akrigis ilian malsaton, kiun ili devintus kontentigi, kaj tial ili komencis la praktikon de noktlaboro. Tio signifas, ke post lacigi unu grupon da manoj, kiu laboris dum la tago, ili laborigis alian grupon dum la nokto; la taggrupo iris en la litojn, kiujn la noktgrupo ĵus forlasis, kaj inverse. Estas popola tradicio en *Lancashire*, ke la litoj neniam malvarmiĝas."[342]

341 Eden, l.c., b. II, ĉ. I, p. 421.

342 John Fielden: „T*he Curse of the Factory System*", Londono, 1836, p. 5, 6. – Pri la originaj fiaĵoj de la fabriksistemo kp d-ro Aikin (1795), l.c., p. 219, kaj Gisborne: „*Enquiry into the duties of men*", 1795, vol. II. – Ĉar la vapormaŝino delokis la fabrikojn el la kamparaj akvofluejoj en la mezon de la urboj, la „abstinema" plusfaristo trovis nun la infanmaterialon ĉemane, sen perforta venigo de sklavoj el la labordomoj. – Kiam Sir R. Peel (patro de la „ministro de evidento") en 1815 prezentis sian leĝproponon por protekto de infanoj, F. Horner (brilulo de la Bullion-komitato kaj intima amiko de Ricardo) en la malsupra ĉambro: „Estas konate, ke antaŭ nelonge, kun la moveblaĵoj de bankrotinto, bando de fabrikinfanoj, se mi rajtas uzi tiun esprimon, estis

Kun la evoluo de la kapitalisma produktado dum la manufaktura periodo la publika opinio de Eŭropo perdis la lastan reston da hontosento kaj da konscienco. La nacioj cinike fanfaronis pri ĉia fiaĵo kiu povis esti rimedo por akumuli kapitalon. Sufiĉas legi ekz-e la naivajn jarraportojn pri komerco, de la honestulo A. Anderson. Tiu teksto fanfaronas, kiel triumfon de angla ŝtatsaĝo, ke Anglio en la packontrakto de Utreĥto, per la traktato de Asiento, devigis la hispanojn cedi al ĝi la privilegion praktiki, inter Afriko kaj Hispan-Ameriko, la komercon pri nigruloj, kiun ĝi havis ĝis tiam nur inter Afriko kaj siaj posedaĵoj de Orienta Hindio. Anglio tiel povis liveri, ĝis 1743, po 4.800 nigrulojn jare al la hispana Ameriko. Tio samtempe garantias oficialan pretekston por la brita kontrabando. Liverpulo ege kreskis surbaze de la sklavkomerco. Tiu estas ĝia metodo de origina akumulado. Kaj ĝis hodiaŭ la liverpulaj „honestuloj" himne laŭdas la specifajn virtojn de la sklavkomerco, kiu „disvolvas la spiriton de komerca entreprenemo ĝis pasio, edukas famajn maristojn kaj enspezigas eksterordinaran monon".[343] Liverpulo uzis en la jaro 1730 por la sklavkomercoj 15 ŝipojn, en 1751: 53, en 1760: 74, en 1770: 96 kaj en 1792: 132.

Dum la kotonindustrio en Anglio enkondukis la infansklavecon, ĝi samtempe instigis al transformado de antaŭe pli aŭ malpli patriarĥeca sklavismo de Usono en sistemon de komerca ekspluatado. Ĝenerale, la vualita sklaveco de la dunglaboristoj en Eŭropo bezonis kiel piedestalon la senvualan sklavecon en la nova mondo.[344]

Necesis tiom da penado por liberigi la „eternajn naturleĝojn" de la kapitalisma produktadmaniero, por plenumi la disigprocezon inter laboristoj kaj laborrimedoj, por transformi sur unu poluso la sociajn produktad- kaj viv-rimedojn en kapitalon, sur la mala poluso la popolamason en

aŭkcie proponitaj kaj venditaj kiel parto de la aktivo! Antaŭ du jaroj (1813) prezentiĝis abomenindaĵo antaŭ la supera kortego (*King's Bench*). Temis pri certa nombro da knaboj. Paroĥo de Londono estis ilin transdoninta al fabrikisto, tiu al alia fabrikisto. Ili estis fine malkovritaj de homamiko en stato de absoluta malsato (*absolute famine*). Alian kazon, ankoraŭ pli abomenindan, mi eksciis kiel ano de la parlamenta enket-komisiono. Antaŭ nur kelkaj jaroj, paroĥo de Londono faris kontrakton kun fabrikisto, en kiu estis fiksite ke por po dudek sanaj infanoj tiu devas akcepti unu idioton."

343 Vd la jam cititan libron de d-ro Aikin, el la jaro 1795.

344 En la jaro 1790, en la angla Okcident-Hindujo, estis dek sklavoj por unu libera homo, en la franca 14 por unu, en la nederlanda 23 por unu. (Henry Brougham: „*An Inquiry into the Colonial Policy of the European Powers*", Edinburgo, 1803, vol. II, p. 74)

dunglaboristojn, en liberajn „laborantajn malriĉulojn”, tiun artefaritan produkton de la moderna historio.[345] Se la mono, laŭ Augier, „enmondiĝas kun naturaj sangmakuloj sur unu vango”[346], tiel la kapitalo de kapo ĝis piedo, el ĉiuj poroj, plena de sango kaj koto.[347]

# 7. Historia tendenco de la kapitalisma akumulado

Kiel resumeblas la origina akumulado de la kapitalo, do ĝia historia genezo? Se ĝi ne estas rekta transformado de sklavoj kaj de servutuloj en

345 La esprimo „laborantaj malriĉuloj” („*labouring poor*”) troviĝas en la anglaj leĝoj ekde la momento, kiam la klaso de dunglaboristoj fariĝas rimarkinda. La „laborantaj malriĉuloj” estas unuflanke kontrastigitaj al la „nelaborantaj malriĉuloj” („*idle poor*”), almozuloj ktp, aliflanke al la laboristoj, kiuj ankoraŭ ne estas „senplumigitaj”, sed proprietuloj de siaj laborrimedoj. La esprimo „laborantaj malriĉuloj” transiris el la leĝo en la politikan ekonomion, de Culpeper, J. Child ktp ĝis A. Smith kaj Eden. Laŭ tio oni prijuĝu la sinceron de la „naŭza politika hipokritulo” Edmund Burke, kiam li nomas la esprimon „laborantaj malriĉuloj” („*labouring poor*”) „naŭza politika hipokriteco” („*execrable political cantmonger*”). Tiu hipokritulo, kiu en la dungo de la angla oligarĥio ludis la romantikulon kontraŭ la Franca Revolucio, same kiel li, en la dungo de la nordamerikaj kolonioj komence de la amerikaj perturboj, ludis la liberalulon kontraŭ la angla oligarĥio, estis ĝisoste ordinara burĝo: „La leĝoj de la komerco estas la leĝoj de la naturo kaj sekve la leĝoj de Dio”. (E. Burke, „*Thoughts and Details on Scarity*”, Londono, 1800, p. 31, 32) Ne mirige, ke li, fidela al la leĝoj de Dio kaj de la naturo, ĉiam vendis sin mem al la plej alte paganto! Cetere oni trovas en la skribaĵoj de la Rev. Tucker – tiu estis pastro kaj *tory*, sed cetere honestulo kaj bona ekonomikisto – tre bonan karakterizon de tiu Edmund Burke dum ties liberala tempo. Fronte al la fia senkaraktereco, kiu regas nuntempe kaj kiu plej devote kredas „la leĝojn de la komerco”, estas nia devo, ree kaj ree publike denunci ulojn kiajn Burke, kiun nenio distingas disde liaj posteuoj ol la talento.

346 Marie Augier: „*Du Crédit Public*”, [Parizo, 1842, p. 265].

347 „Kapitalo, diras la *Quarterly Reviewer*, fuĝas tumulton kaj disputon kaj estas timema. Tio estas tre vera, tamen ne la tuta vero. La kapitalo sentas hororon antaŭ foresto de profito aŭ eta profito, kiel la naturo sentas hororon antaŭ la malpleno. Kun konvena profito kapitalo fariĝas kuraĝa. Dek procentoj sekuraj, kaj oni povas ĝin apliki ĉie; 20 procentoj, ĝi fariĝas vigla; 50 procentoj, pozitive aŭdaca; por 100 procentoj ĝi stamfas ĉiajn homajn leĝojn sub sia piedo; 300 procentoj, kaj ekzistas nenia krimo, kiun ĝi ne riskas, eĉ minace de pendumilo. Se tumulto kaj disputo alportas profiton, ĝi kuraĝigos ambaŭ. Pruvo: kontrabando kaj sklavkomerco.” (J. Dunning, l.c., p. 35, 36)

dunglaboristojn, ĝi signifas nur la senproprietigon de la rektaj produktantoj, do la dissolvon de la privata proprieto baziĝanta sur propra laboro.

Privata proprieto, kiel kontraŭo al la socia, kolektiva proprieto, ekzistas nur tie, kie la laborrimedoj kaj la eksteraj kondiĉoj de la laboro apartenas al privatuloj. Sed laŭ tio, ĉu tiuj privatuloj estas la laboristoj aŭ la nelaboristoj, la privata proprieto havas diversan karakteron. La senfinaj nuancoj, kiujn ĝi unuavide montras, respegulas nur la interajn statojn inter tiuj du ekstremoj.

La privata proprieto de la laboristo je siaj produktadrimedoj estas la bazo de la etentrepreno, la etentrepreno necesa kondiĉo por la evoluo de la socia produktado kaj de la libera individueco de la laboristo mem. Tamen tiu produktadmaniero ekzistas ankaŭ ene de la sklavismo, de la servutismo kaj de aliaj dependeckondiĉoj. Sed ĝi floras, ŝprucas sian tutan energion, konkeras la taŭgan klasikan formon nur tie, kie la laboristo estas libera privata proprietulo de siaj laborkondiĉoj, kiujn li mastrumas mem, la kampulo de la kampo, kiun li kulturas, la metiisto de la instrumento, kiun li manipulas kvazaŭ virtuozo.

Tiu produktadmaniero de etaj sendependaj produktistoj, kiuj laboras por si mem, premisas dispececon de la grundo kaj de la ceteraj produktadrimedoj. Kiel ĝi ekskludas la koncentriĝon de tiuj lastaj, ĝi ekskludas ankaŭ la kunlaboradon. labordividon ene de la samaj produktadprocezoj, socian dominadon kaj reguladon de la naturo, liberan evoluon de la sociaj produktadfortoj. Ĝi estas akordigebla nur en mallarĝaj limoj de la produktado kaj de la socio. Voli eternigi ĝin, signifus, kiel Pecqueur prave diras, „dekreti la ĝeneralan mezkvaliton”. Je certa nivelo ĝi enmondigas la materiajn rimedojn por sia propra neniigo. Ekde tiu momento ekmoviĝas fortoj kaj pasioj en la sino de la socio, kiuj sentas sin ligitaj de ĝi. Ĝi devas esti neniigata, ĝi estas neniigata. Ĝia neniigo, la transformado de la individuaj kaj disaj produktadrimedoj en sociajn koncentritajn, por tio de la nana proprieto de multaj en la amasan proprieton de malmultaj, pro tio la senproprietigo de la granda popolamaso je la grundo, vivrimedoj kaj laborinstrumentoj, tiu terura kaj malfacila senproprietigo de la popolamaso konsistigas la prahistorion de la kapitalo. Ĝi entenas serion da perfortaj metodoj, el kiuj ni montris nur la epokfarajn kiel metodojn de la origina akumulado de la kapitalo. La senproprietigo de la rektaj produktistoj fariĝas per plej senkompata vandalismo kaj sub pelado de la plej fiaj, plej aĉaj, plej etanime plej malamaj pasioj. La mem perlaboritan privatan proprieton, kiu baziĝis kvazaŭ sur kunkresko de la unuopa, sendependa

laborindividuo kun siaj laborkondiĉoj, anstataŭas la kapitalisma privata proprieto, kiu baziĝas sur ekspluatado de fremda, sed formale libera laboro.[348]

Ekde kiam tiu procezo de transformado laŭ profundo kaj amplekso estas sufiĉe malkomponinta la malnovan socion, ekde kiam la laboristoj estas transformitaj en proletojn, iliaj laborkondiĉoj en kapitalon, ekde kiam la kapitalisma produktadmaniero staras sur propraj piedoj, la plua sociigo de la laboro kaj plua transformado de la tero kaj de aliaj produktadrimedoj en socie ekspluatatajn, do komunajn produktadrimedojn, pro tio la plua senproprietigo de la privataj proprietuloj, akiras novan formon. Kio estas nun senproprietigenda, tio jam ne estas plu la memmastrumanta laboristo, sed la multajn laboristajn ekspluatanta kapitalisto.

Tiu senproprietigo okazas per la ludo de la imanentaj leĝoj de la kapitalisma produktado mem, per la centraliĝo de la kapitaloj. Po unu kapitalisto mortbatas multajn da ili. Man-en-mane kun tiu centraliziĝo aŭ senproprietigo de multaj kapitalistoj fare de malmultaj, evoluas la kunlabora formo de la laborprocezo laŭ ĉiam pli kreskanta skalo, la konscia aplikado de la scienco, la laŭplana ekspluatado de la tero, la transformado de la laborrimedoj en nur komune aplikeblajn laborrimedojn, la ekonomiigo de ĉiaj produktadrimedoj per ilia uzado kiel produktadrimedo de kombinita, socia laboro, la englutado de ĉiuj popoloj en la reton de la mondmerkato kaj per tio la internacia karaktero de la kapitalisma reĝimo. Kun la konstante malkreskanta nombro de la kapitalmagnatoj, kiuj uzurpas kaj monopoligas ĉiajn avantaĝojn de tiu transformadprocezo, kreskas la maso de mizero, de premo, de sklaveco, de degradiĝo, de ekspluatado, sed ankaŭ de ribelado de la ĉiam ŝvelanta kaj per la meĥanismo de la kapitalisma produktadprocezo mem instruata, unuigata kaj organizata laborista klaso. La kapitalmonopolo fariĝas baro de la produktadmaniero, kiu kun kaj sub ĝi ekfloris. La centralizado de la produktadrimedoj kaj la sociigo de la laboro atingas punkton, kie ili fariĝas neakordigeblaj kun sia kapitalisma ŝelo. Tiu estas krevigata. La fina horo de la kapitalisma privata proprieto sonas. La senproprietigistoj estas senproprietigataj.

La kapitalisma alproprigmaniero, kiu estiĝas el la kapitalisma produktadmaniero, pro tio la kapitalisma privata proprieto, estas la unua negacio de la individua privata proprieto bazita sur propra laboro. Sed la kapital-

348 „Ni troviĝas en situacio, kiu estas por la socio tute nova … ni strebas al disigo de ĉia proprieto disde ĉia laboro.” (Sismondi: „*Nouveaux Principes de l’Économie Politique*”, vol. II, p. 434)

isma produktado kreas necese kiel naturprocezo sian propran negacion. Tiu estas la negacio de la negacio. Tiu ne restarigas la jam detruitan[349] privatan proprieton, sed ja individuan proprieton surbaze de la atingoj de la kapitalisma erao: individuan proprieton bazitan sur la kunlaborado kaj komuna posedo de la tero kaj de la produktadrimedoj produktitaj per la laboro mem.

La transformado de la disa privata proprieto bazita sur propra laboro de la individuoj en kapitalisman proprieton estas kompreneble procezo senkompare pli longa, akra kaj malfacila ol la transformado de la kapitalisma proprieto, kiu fakte jam baziĝas sur socia produktado, en socian proprieton. Tie temis pri la senproprietigo de la popolamaso fare de malmultaj uzurpistoj, ĉi tie temas pri la senproprietigo de malmultaj uzurpistoj fare de la popolamaso.[350]

---

349„jam detruitan” laŭ la hispana eldono. -vl

350„La progreso de la industrio, kies senvola kaj senkontraŭstara portanto estas la burĝaro, metas sur la lokon de la izoliĝo de la laboristoj per la konkurenco ĝian revolucian unuiĝon per la asociiĝo. Do la evoluo de la grandindustrio eltiras sub la piedoj de la burĝaro la bazon mem, sur kiu ĝi produktas kaj alpropigas al si la produktojn. Ĝi produktas antaŭ ĉio sian propran tombofosiston. Ĝia pereo kaj la venko de la proletaro estas same neeviteblaj … La mezaj klasoj, la etindustriisto, la etkomercisto, la metiisto, la kamparano – ili ĉiuj batalas kontraŭ la burĝaro, por savi sian ekziston kiel mezaj klasoj antaŭ la pereo … ili estas reakciaj, ili klopodas retroturni la radon de la historio.

(Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la komunista partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5. La sama teksto troviĝis – ĝis meze de 2009 – en la reto en formo de „eLibro”, libere elŝutebla ĉe http://www.omnibus.se/inko/, enpaĝigita de Franko Luin en 2002, ISBN 91-7303-142-9 kaj nun elŝutebla ĉe <http://www.marxists.org>.)

La sama teksto troviĝas nun en kolektaĵo de tri diversaj Esperantaj tradukoj de la „Komunista Manifesto”, nome en: Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo, komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011 ISBN 978-2-918300-45-8, p. 57; 55. -vl)

# *DUDEKKVINA ĈAPITRO La moderna koloniigteorio*

La politika ekonomio konfuzas principe du tre diversajn specojn de privata proprieto, el kiuj la unua baziĝas sur propra laboro de la produktanto, la alia sur la ekspluatado de fremda laboro. Ĝi forgesas, ke la lasta ne nur konsistigas la rektan malon de la unua, sed ankaŭ kreskas nur sur ties tombo.

En okcidenta Eŭropo, la hejmlando de la politika ekonomio, la procezo de la origina akumulado estas pli aŭ malpli plenumita. La kapitalisma reĝimo tie aŭ submetis la tutan nacian produktadon rekte al si, aŭ, kie la kondiĉoj estas ankoraŭ malpli evoluintaj, ĝi almenaŭ malrekte kontrolas la sociajn tavolojn, kiuj apud ĝi pluekzistas kaj iom post iom kadukiĝas kun la malnova produktadmaniero, al kiu ili apartenas. Al tiu jam elfarita kapitalmondo la ekonomikisto aplikas la nociojn de juro kaj de proprieto el antaŭkapitalisma mondo kun des pli da fervoro kaj des pli pia afekteco, ju pli draste la faktoj protestas kontraŭ lia ideologio.

En la kolonioj okazas tute alie. La kapitalisma reĝimo trafas tie ĉie sur la obstaklon de la produktisto, kiu kiel posedanto de siaj propraj laborkondiĉoj riĉigas sin mem anstataŭ la kapitaliston. La kontraŭdiro de tiuj du rekte malaj ekonomiaj sistemoj agas tie praktike en sia batalo. Kie la kapitalisto estas apogata de la potenco de sia metropolo[351], li provas perforte forigi la produktad- kaj alproprig-manieron kiu baziĝas sur propra laboro. La sama intereso, kiu igas la lakeojn de la kapitalo, la ekonomikistojn, en la metropolo deklari la kapitalisman produktadmanieron teorie ĝian propran malon, la sama intereso igas lin ĉi tie eldiri la aferon senorname („*to make a clean breast of it*") kaj laŭte proklami la diferencon de la du produktadmanieroj. Por tio li pruvas, ke la disvolvado de la socia produktadforto de la laboro, kunlaborado, labordivido, grandskala aplikado de maŝinoj ktp ne eblas sen la senproprietigo de la laboristoj kaj la responda transformado de iliaj produktadrimedoj en kapitalon. En la intereso de tio, kion li ŝatas nomi la nacia riĉeco, li serĉas artifikaĵojn por efektivigi la malriĉecon de la popolo. Ĉi tie, lia apologia karapaco diseriĝas pecon post peco kiel putra ligno.

Estas la granda merito de E. G. Wakefield, ke li malkovris ne ian novan pri la kolonioj,[352] sed en la kolonioj la veron pri la kapitalismaj kondiĉoj

351 *En la originalo: seines Vaterlandes* (de sia patrolando / patrujo). -vl

352 La malmultaj helaj rimarkoj de Wakefield pri la kolonioj estis jam antaŭe disvolvitaj de Mirabeau patro, la fiziokrato, kaj eĉ antaŭ tiu de la anglaj

de la metropolo. Kiel la doganprotektisma sistemo en siaj originoj[353] alstrebas la fabrikadon de kapitalistoj en la metropolo, tiel la kolonia teorio de Wakefield, kiun Anglio dum certa tempo provis leĝe realigi, alstrebas la fabrikadon de dunglaboristoj en la kolonioj. Tion li nomas sistema koloniigado („*systematic colonization*”).

Wakefield malkovris unue en la kolonioj, ke la proprieto je mono, vivrimedoj, maŝinoj kaj je aliaj produktadrimedoj ankoraŭ ne stampas homon kapitalisto, se la kompletigo mankas, la dunglaboristo, la alia homo, kiu vidas sin devigata libervole vendi sin mem. Li malkovris, ke la kapitalo ne estas aĵo, sed de aĵoj perata socia rilato inter personoj.[354] Li lamentas al ni, ke s-ro Peel prenis vivrimedojn kaj produktadrimedojn en la valoro de 50.000 sterlingaj pundoj el Anglio al la Svanrivero, en Nov-Holando. S-ro Peel estis sufiĉe singarda kunporti ankaŭ tri mil personojn de la laboranta klaso, virojn, virinojn kaj infanojn. Tuj kiam li alvenis ĉe sia celloko, „s-ro Peel restis sen eĉ unu servisto por fari lian liton aŭ por ĉerpi por li akvon el la rivero”.[355] Malfeliĉa s-ro Peel, kiu prizorgis ĉion, nur ne la eksporton de la anglaj produktadkondiĉoj al la Svan-rivero!

Por kompreni la sekvajn malkovrojn de Wakefield, necesas du antaŭ-rimarkoj. Oni scias, ke produktad- kaj viv-rimedoj, kiel proprieto de la rekta produktisto, ne estas kapitalo. Ili fariĝas kapitalo nur sub kondiĉoj, en kiuj ili servas samtempe kiel rimedoj por ekspluati kaj superregi la laboriston. Sed tiu ilia kapitalisma animo estas en la kapo de la ekonomik-isto tiom intime ligita kun ilia materia substanco, ke li ĉiel nomas ilin kapitalo, ankaŭ tie, kie ili estas la rekta malo. Tiel ĉe Wakefield. Krome: la disecon de la produktadrimedoj kiel individua proprieto de multaj memmastrumantaj laboristoj, sendependaj unu de la alia, li nomas *egala divido de la kapitalo*. Al la ekonomikisto okazas kiel al la feŭda juristo.

---

ekonomikistoj de la 17-a jarcento, ekz-e Culpeper, Child ktp.

353 Ĝi fariĝis poste provizora neceso en la internacia konkurencbatalo. Sed kia ajn estas ĝia motivo, la sekvoj restas la samaj.

354 „Nigrulo estas nigrulo. En certaj kondiĉoj li fariĝas sklavo. Kotonŝpinmaŝino estas maŝino por kotonŝpinado. Nur en certaj kondiĉoj ĝi fariĝas *kapitalo*. Elŝirita el tiuj kondiĉoj, ĝi ne estas kapitalo, same kiel oro per si mem ne estas *mono* aŭ sukero la sukerprezo. … La kapitalo estas socia produktadrilato. Ĝi estas historia produktadrilato.” (Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo („*N[eue] ’Rh[einische] Z[eitung*]”, n-ro 266 de la 7-a de aprilo 1849. <MEW, vol. 6, p. 407, 408>), elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, p. 18, 19.

355 E. G. Wakefield: „*England and America*”, vol. II, p. 33.

Ankaŭ tiu gluis al puraj monrilatoj siajn feŭdajn jur-etikedojn.

> „Se la kapitalo”, diras Wakefield, „estus inter ĉiuj membroj de la socio dividita en same grandajn porciojn, tiam neniu homo havus intereson akumuli pli da kampitalo ol kiun li povas apliki per siaj propraj manoj. Tio estas certagrade la kazo en novaj amerikaj kolonioj, kie la pasio de la grundproprieto malebligas la ekziston de klaso de dunglaboristoj.”[356]

Tiom longe, kiom la laboristo povas akumuli por si mem, kaj tion li povas, tiom longe kiom li restas proprietulo de siaj produktadrimedoj, la kapitalisma akumulado kaj la kapitalisma produktadmaniero estas maleblaj. Mankas la por tio nemalhavebla klaso de dunglaboristoj. Kiel oni kreis en la malnova Eŭropo la senproprietigon de la laboristo je liaj laborkondiĉoj, do kapitalon kaj dunglaboron? Per socia traktato (*contrat social*) de tute originala specio.

> „La homaro … adoptis simplan metodon por subteni la akumuladon de kapitalo”, kiun ĝi kompreneble imagis ekde la pratempo kiel lastan kaj solan celon de sia ekzistado; „ĝi dividis sin en proprietulojn de kapitalo kaj proprietulojn de laboro … tiu divido estis la rezulto de libervola interkompreniĝo kaj kombiniĝo.”[357]

Per unu vorto: la amaso de homaro senproprietigis sin mem honore al la „akumulado de la kapitalo”. Laŭ tio oni ja rajtus kredi, ke la instinkto de tiu abnegacia fanatikeco devus plej senbride agi ĝuste en la kolonioj, la sola loko kie ekzistas homoj kaj cirkonstancoj, kiuj povus transigi socian traktaton el la regno de la revoj en tiun de la realo. Sed tiam leviĝas la demando, kial entute necesas la „sistema koloniigado” kontraste al la natura koloniigo? Nu, nu:

> „en la nordaj ŝtatoj de la amerika Unio estas dubinde, ĉu dekono de la loĝantaro apartenas al la kategorio de dunglaboristoj … En Anglio … la granda popolamaso konsistas el dunglaboristoj.”[358]

Fakte, la emo de la laboranta homaro senproprietigi sin mem honore al la kapitalo ekzistas tiom malmulte, ke la sklavismo, eĉ laŭ Wakefield, estas la sola natura bazo de la kolonia riĉeco. Lia sistema koloniigado estas nura elturniĝo, ĉar li devas ja trakti pri liberuloj kaj ne pri sklavoj.

> „La unuaj hispanaj setlantoj en Sankta Domingo ne ricevis laboristojn el Hispanio. Sed sen laboristoj” (t.e. sen sklavismo) „la kapitalo pereintus aŭ almenaŭ ŝrumpintus al tiom malgrandaj kvantoj, kiajn ĉiu individuo povas

356 Saml., vol. I, p. 17.

357 Saml., p. 18.

358 Saml., p. 42, 43, 44.

apliki per siaj propraj manoj. Tio vere okazis en la lasta kolonio fondita de angloj, kie granda kapitalo en semoj, brutaro kaj instrumentoj pereis pro manko de dunglaboristoj kaj kie neniu setlanto posedas pli da kapitalo ol kiun li povas apliki per siaj propraj manoj."[359]

Ni vidis: la senproprietigo de la popolamaso je grundo konsistigas la bazon de la kapitalisma produktadmaniero. La esenco de libera kolonio konsistas, inverse, en tio, ke la amaso de la grundo estas ankoraŭ proprieto de la popolo kaj ke ĉiu setlanto povas do transformi parton de ĝi en sian privatan proprieton kaj individuan produktadrimedon, sen malhelpi postajn setlantojn fari la saman operacion.[360] Tio estas la sekreto same de la prospero de la kolonioj kiel ankaŭ de ilia kancero – ilia rezistado kontraŭ la enplantiĝo de la kapitalo.

„Kie grundo estas tre malmultekosta kaj kie ĉiuj homoj estas liberaj, kie ĉiu povas laŭplaĉe ricevi pecon da grundo por si mem, tie laboro estas ne nur tre multekosta, koncerne la parton de la laboristo je sia produkto, sed la malfacilaĵo estas akiri kombinitan laboron je ia ajn prezo."[361]

Ĉar en la kolonioj ankoraŭ ne ekzistas la disigo de la laboristo disde la laborkondiĉoj kaj ilia radiko, la grundo, aŭ kie tiu disigo okazas nur sporade aŭ en limigita kadro, tie ankaŭ ankoraŭ ne ekzistas la disiĝo de kampkulturo kaj industrio, ankoraŭ ne la neniigo de la kampara hejmindustrio; kaj en tiaj kondiĉoj, kie trovi por la kapitalo la internan merkaton?

„Neniu parto de la loĝantaro de Ameriko estas ekskluzive kampkultura, kun escepto de la sklavoj kaj de iliaj mastroj, kiuj kombinas kapitalon kaj laboron por grandaj entreprenoj. Liberaj amerikanoj, kiuj kulturas la grundon mem, dediĉas sin samtempe al multaj aliaj okupoj. Parto de la mebloj kaj iloj, kiujn ili uzas, estas kutime farata de ili mem. Tre ofte ili konstruas siajn proprajn domojn kaj portas la produkton de sia propra industrio al la bazaro je ajna distanco. Ili estas ŝpinistoj kaj teksistoj; ili faras sapon kaj kandelojn, kiel en multaj kazoj ŝuojn kaj vestaĵojn por sia propra uzo. En Ameriko kampkulturo estas ofte flanka okupiĝo de forĝisto, muelisto aŭ komercisto."[362]

Kie restas inter tiaj stranguloj la „kampo de abnegacio" por la kapitalisto?

---

359 Saml., vol. II, p. 5.

360 „Grundo, por fariĝi elemento de koloniigado, devas ne nur esti nekulturita, sed ankaŭ publika proprieto transformebla en privatan proprieton." (saml., vol. II, p. 125)

361 Saml., vol. I, p. 247.

362 Saml., p. 21, 22.

La granda belaĵo de la kapitalisma produktado konsistas en tio, ke ĝi ne nur konstante reproduktas la dunglaboriston kiel dunglaboriston, sed proporcie al la akumulado de la kapitalo produktas ĉiam relativan superloĝantaron da dunglaboristoj. Tiel oni tenas la leĝon de laborpostulo kaj laborprovizo en la taŭga vojo, tenas la osciladojn de la salajro inter la limoj favoraj al la ekspluatado, kaj fine certigas la tiom nemalhaveblan socian dependecon de la laboristo rilate al la kapitalisto, absolutan dependecrilaton, kiun la ekonomikisto hejme, en la metropolo, povas mensoge prezenti kiel rilaton de libera kontrakto inter aĉetanto kaj vendanto, de same sendependaj varposedantoj, posedantoj de la varo kapitalo kaj de la varo laboro. Sed en la kolonioj la bela iluzio rompiĝas. La absoluta loĝantaro kreskas tie multe pli rapide ol en la metropolo, per tio ke multaj laboristoj enmondiĝas plenkreske, kaj tamen la labormerkato estas ĉiam nesufiĉe provizita. La leĝo de propono kaj provizo de laboro rompiĝas. Unuflanke la malnova mondo konstante enĵetas ekspluateman kapitalon bezonan je abnegacio; aliflanke la regula reproduktado de la dunglaboristoj kiel dunglaboristoj trafas sur la plej aĉajn kaj parte nesupereblajn malhelpojn. Kaj nun eĉ la produktado de superfluaj dunglaboristoj proporcie al la akumulado de la kapitalo! La hodiaŭa dunglaboristo fariĝas morgaŭ sendependa, memmastrumanta kamparano aŭ metiisto. Li malaperas el la labormerkato, sed – ne en la labordomon (*workhouse*). Tiu konstanta transformiĝo de la dunglaboristoj en sendependajn produktistojn, kiuj laboras anstataŭ por la kapitalo por si mem kaj riĉigas anstataŭ la kapitaliston sin mem, reefikas unuflanke tre malutile al la kondiĉoj de la labormerkato. Ne nur en tio, ke la ekspluatgrado de la dunglaboristo restas ofende malalta, sed krome la salajrulo perdas kun la reala dependeco ankaŭ la senton de dependeco vide al la abnegacia kapitalisto. Tio kaŭzas ĉiajn misojn, kiujn nia E. G. Wakefield tiom brave, tiom elekvente kaj tiom kortuŝe priskribas.

La provizo de dunglaboro, plendas li, estas nek konstanta nek regula, nek sufiĉa. Ĝi „estas konstante ne nur tro malgranda, sed malcerta”.[363]

> „Kvankam la produkto dividenda inter laboristo kaj kapitalisto estas granda, la laboristo alprenas tiom grandan parton, ke li rapide fariĝas kapitalisto … Aliflanke malmultaj, eĉ se ili vivas nekutime longe, povas akumuli grandajn riĉaĵojn.”[364]

La labristoj simple ne permesas al la kapitalisto rezigni pri pago de la plej granda parto de ilia laboro. Ankaŭ ne helpas, se li estas sufiĉe ruza

363 Saml., vol. II, p. 116.

364 Saml., vol. I,, p. 131.

por importi el Eŭropo kun sia kapitalo ankaŭ siajn proprajn dunglaboristojn.

> „Ili baldaŭ ĉesas esti dunglaboristoj, ili baldaŭ transformiĝas en sendependajn kamparanojn aŭ eĉ en konkurantoj de iliaj iamaj mastroj sur la dunglaborista merkato mem."[365]

Oni komprenu la teruraĵon! La brava kapitalisto importis siajn verajn konkurantojn mem el Eŭropo per sia propra bona mono! Jen la pinto! Ne mirige, se Wakefield plendas pri mankanta disciplino ĉe la dunglaboristoj de la kolonioj kaj pri la foresto de dependeco-sento. Pro la altaj salajroj, diras lia disĉiplo Merivale, en la kolonioj ekzistas la pasia emo je pli malmultekosta kaj pli submetiĝema laboro, je klaso, al kiu la kapitalisto povas dikti la kondiĉojn, anstataŭ ricevi ilin diktitaj de ĝi … En malnove civilizitaj landoj la laboristo, kvankam libera, estas naturleĝe dependa de la kapitalisto, en kolonioj tiu dependeco kreendas per artefaritaj rimedoj.[366]

Kio estas, laŭ Wakefield, la sekvo de tiu misa situacio en la kolonioj? „Barbara sistemo de malkoncentriĝo" de la produktistoj kaj de la nacia

365 Saml., vol. II, p. 5.

366 Merivale, l.c., vol. II, p. 235-314 divl. Eĉ la milda, liberkomercisma vulgarekonomikisto Molinari diras: „En la kolonioj, en kiuj la sklavismo estas forigita, sen ke oni anstataŭigis la devigan laboron per responda kvanto da libera laboro, oni vidis okazi la malon de tio, kio ĉiutage okazas antaŭ niaj okuloj. Oni vidis la simplajn laboristojn siaflanke ekspluati la industriajn entreprenistojn, per tio ke ili postulis de ili salajrojn, kiuj neniel rilatis kun la parto, je kiu ili prave rajtis je la produkto. Ĉar la plantistoj estis nekapablaj akiri por sia sukero sufiĉan prezon por povi kovri la altiĝon de la salajroj, ili estis devigataj kovri la pli altan sumon unue el siaj profitoj, poste el siaj kapitaloj mem. Granda kvanto da plantistoj estis tiamaniere ruinigitaj, dum aliaj fermis siajn entreprenojn, por eviti la okazontan ruiniĝon … Estas sendube pli bone vidi amasiĝojn de kapitaloj perei ol generaciojn de homoj" (kiom larĝanime de s-ro Molinari!); „sed ĉu ne estus pli bone, se nek la unuaj nek la aliaj pereus?" (Molinari, l.c., p. 51, 52) Aĥ, s-ro Molinari, s-ro Molinari! Kio fariĝos la dek ordonoj, kio fariĝos Moseo kaj profetoj, kio fariĝos la leĝo de postulo kaj propono, se en Eŭropo la „entreprenisto" povas mallongigi al la laboristo kaj en Okcidenta Hindio la laboristo al la entreprenisto lian laŭrajtan parton (*part légitime*)? Kaj, bonvolu, kio estas tiu „laŭrajta parto" („*part légitime*"), kiun laŭ via konfeso en Eŭropo la kapitalisto ĉiutage ne pagas? S-ro Molinari sentas egan tenton, tie, en la kolonioj, kie la laboristoj estas sufiĉe „simplaj" por ekspluati la kapitaliston, funkciigi la alie aŭtomate efikantan leĝon de postulo kaj propono – per la polico.

riĉaĵo.[367] La malkoncentriĝo de la produktadrimedoj inter sennombraj memmastrumantaj proprietuloj neniigas la centraliĝon de la kapitalo kaj samtempe ĉian bazon de kombinita laboro. Ĉia iom longdaŭra entrepreno, kiu etendiĝas tra jaroj kaj bezonas la elspezon de konsiderinda fiksa kapitalo, trafas sur problemojn. En Eŭropo la kapitalo ne hezitas eĉ momenton, ĉar la laborista klaso estas ĝia vivanta apartenaĵo, ĉiam abunde ekzistanta, ĉiam disponebla. Sed en la koloniaj landoj! Wakefield rakontas plej dolorriĉan anekdoton. Li babilis kun kelkaj kapitalistoj de Kanado kaj de la ŝtato Novjorko, kie krome la ondoj de elmigrado ofte haltas kaj demetas sedimenton de „supernombraj” laboristoj.

> „Nia kapitalo”, suspiras unu el la personoj de la melodramo, „nia kapitalo estis preta por multaj operacioj, kiuj bezonas konsiderindan periodon por sia finiĝo; sed ĉu ni povis komenci tiajn operaciojn kun laboristoj, kiuj, kiel ni sciis, baldaŭ turnos al ni la dorson? Se ni estintus certaj povi reteni la laboron de tiaj enmigrintoj, ni kun ĝojo tuj dungintus ilin kaj je alta prezo. Ja, eĉ malgraŭ la certeco de ilia perdo ni tamen dungintus ilin, se ni estintus certaj pri freŝa provizado laŭ nia bezono.”[368]

Post pompe kontrastigi la anglan kapitalisman kampkulturon kaj ĝian „kombinitan” laboron kun la disparcela amerika kampkulturo, Wakefield lasas malgraŭvole aperi ankaŭ la dorson de la medalo. Li priskribas la amerikan popolamason kiel prosperan, sendependan, entrepreneman kaj relative kleran, dum

> „la angla kamplaboristo estas mizera ĉifonulo (*a miserable wretch*), paŭperulo … En kiu lando ekster Nordameriko kaj kelkaj novaj kolonioj la salajroj de la libera laboro aplikata en la kamparo superas konsiderinde la plej nemalhaveblajn vivrimedojn de la laboristo? … Sen ajna dubo kampĉevaloj en Anglio, ĉar tiuj estas valora proprietaĵo, estas multe pli bone nutrataj ol la angla kamplaboristo.”[369]

Sed ne gravas, nacia riĉeco estas ja per la naturo identa kun mizero de la popolo.

Kiel nun kuraci la kontraŭkapitalisman kanceron de la kolonioj? Se oni volus unufrape transformi ĉian grundon el popolproprieto en privatan proprieton, tiam oni ja detruus la radikon de la malbono, sed ankaŭ – la kolonion. La tuta arto estas, trafi per unu ŝtonĵeto du celojn. La registaro devas do vendi tiun virgan teron je artefarita prezo, oficiale fiksita de ĝi, sen ia ajn rilato kun la leĝo de propono kaj postulo. La enmigrinto estus

367 Wakefield, l.c., vol. II, p. 52.

368 Wakefield, l.c., vol. II, p. 52.

369 Saml., p. 191, 192.

tiel devigata dunglabori dum iom pli longa tempo, ĝis kiam li povas perlabori sufiĉe da mono por aĉeti grundon[370] kaj transformiĝi en sendependan terkulturiston. La fonduso nutrata el la vendo de la grundoj por prezo relative neatingebla por la dunglaboristo, do tiu monfonduso elpremita el la salajro per rompo de la sankta leĝo de postulo kaj propono, tiu fonduso estu aliflanke uzata de la registaro, por, en la sama proporcio kiel ĝi kreskas, importi senhavulojn el Eŭropo en la koloniojn kaj tiel teni por la kapitalisto ties merkaton de dunglaboro plena. Sub tiaj cirkonstancoj ĉio estus plej bona en la plej bona de la mondoj. Jen la granda sekreto de la „sistema koloniado”.

> „Laŭ tiu plano”, triumfe ekkrias Wakefield, „la alveno de laboro devas esti konstanta kaj regula; ĉar unue, ĉar neniu laboristo kapablas akiri por si landon antaŭ ol esti laborinta por mono, ĉiuj enmigrintaj laboristoj, per tio ke ili laboras kombinite por salajro, produktas por sia aplikanto kapitalon por aplikado de pli da laboro; kaj due, ĉiu, kiu forlasus la dunglaboron kaj fariĝus grundproprietulo, ĝuste per la aĉeto de la grundo certigus fonduson por importado de freŝa laboro en la koloniojn.”[371]

La ŝtate trudata grundprezo devas kompreneble esti „sufiĉe” alta (*sufficient price*), „ke ĝi malebligu fariĝi sendependaj terkulturistoj, ĝis kiam aliaj estu tie por alpreni ilian lokon en la dunglabora merkato”.[372] Tiu „sufiĉa grundprezo” estas nenio alia ol eŭfemismo por la ĉantaĝa mono, kiun la laboristo pagas al la kapitalisto por la permeso retiriĝi el la dunglabora merkato en la kamparon. Unue li devas krei „kapitalon” al la sinjoro kapitalisto, por ke tiu povu ekspluati pli da laboristoj, kaj poste zorgi pri „anstataŭulo” en la labormerkato, kiun la registaro liakoste sendas transmare al lia eksa sinjoro kapitalisto.

Estas plej karakterize, ke la angla registaro dum jaroj realigis tiun metodon de „origina akumulado” preskribitan de s-ro Wakefield ĝuste por la uzado en la koloniaj landoj. La fiasko estis kompreneble same honta kiel la bankleĝo de Peel. La fluo de elmigrantoj estis nur deturnita for de

370 „Vi aldonas, ke nur danke al la alproprigo de la grundo kaj de la kapitaloj okazas, ke la homo, kiu posedas nur siajn brakojn, trovas dungon kaj kreas al si enspezon … male, nur la individua alproprigo de la grundo kaŭzas, ke ekzistas homoj kiuj posedas nur siajn brakojn … Se vi delokas homon en senaeran ĉambron, vi rabas al li la aeron. Tiel vi agas ankaŭ, kiam vi alproprigas al vi la grundon … Tio signifas deloki lin en spacon sen ajna riĉaĵo, por ke li ne povu vivi alie ol laŭ via volo.” (Colins, l.c., vol. III, p. 267-271 divl.)

371 Wakefield, l.c., vol. II, p. 192.

372 Saml., p. 45.

la anglaj kolonioj al Usono. Intertempe la progreso de la kapitalisma produktado en Eŭropo, akompanata de kreskanta premo de la registaro, superfluigis la recepton de Wakefield. Unuflanke la giganta kaj seninterrompa homfluo jaron post jaro pelata al Ameriko kreis stagnantajn tavolojn en la oriento de Usono, ĉar la elmigra ondo el Eŭropo ĵetis la homojn pli rapide tien en la labormerkaton, ol la elmigra ondo al la okcidento povas depreni. Aliflanke la usona interna milito sekvigis kolosan nacian ŝuldon kaj kun ĝi impostan premon, kreiĝon de la plej ordinara financoligarĥio, fordonacon de giganta parto de la publikaj teroj al spekul-societoj por ekspluatado de fervojoj, minejoj ktp – mallonge la plej rapidan centraliĝon de la kapitalo. La granda respubliko do ĉesis esti la promesita lando por elmigraj laboristoj. La kapitalisma produktado paŝas tie per gigantaj paŝoj antaŭen, kvankam malaltigo de salajroj kaj dependeco de la dunglaboristo ankoraŭ delonge ne atingis la eŭropan normalan nivelon. La senhonta fordono de la nekulturita kolonia grundo al aristokratoj kaj kapitalistoj, fare de la angla registaro, estis ja laŭte denuncita de Wakefield mem. Ĝi kreis, nome en Aŭstralio,[373] – kune kun la homfluo, kiun la ortrovejoj (*gold-diggings*) altiras, kaj kun la konkurenco, kiun la importo de anglaj varoj kaŭzas eĉ al la plej eta metiisto – sufiĉan „relativan laboristan superloĝantaron", ke preskaŭ ĉiu poŝtŝipo alportas la ĉagrenan novaĵon pri superpleno de la aŭstralia labormerkato („*glut of the Australian labour-market*") kaj ke la prostituado prosperas tie same abunde kiel ĉe la *Haymarket* de Londono.

Tamen ne intersas nin ĉi tie la situacio de la kolonioj. Kio sole interesas nin, estas la sekreto, kiun la politika ekonomio de la malnova mondo malkovris en la nova mondo kaj laŭte proklamis: kapitalisma produktad- kaj akumulad-maniero, do ankaŭ kapitalisma privata proprieto, premisas la neniigon de la privata proprieto bazita sur propra laboro, do la senproprietigon de la laboristo.

373 Tuj kiam Aŭstralio fariĝis sia propra leĝdonanto, ĝi faris leĝojn kompreneble favorajn al la setlantoj, sed la angla, jam plenumita, fordonaco de la grundo obstaklas. „La unua kaj plej grava celo, kiun la nova landleĝo de 1862 alstrebas, konsistas en kreado de pli grandaj facilaĵoj por la setlado de la popolo." („*The Land Law of Victoria, by the Hon. G. Duffy, Minister of Public Lands*", Londono, 1862, [p. 3])

# Indekso de personaj nomoj


**Adamo:** Laŭ la mondkrea mito de la Malnova Testamento (Biblio) de hebreoj, kristanoj kaj islamanoj, la unua homo kreita de la dio.........................................102

**Addington, Stephen** [édingten, stífen] (1729 – 1796) – Angla teologo kaj konservativa ministro ; verkis serion da lernolibroj:..............................................683

**Aikin, John** [éjkn, ĝón] (1747 -- 1822) – Angla kuracisto kaj radikala verkisto 553p., 706, 713p.

Allinsworth..........................................................................................................241

**Anderson, Adam** [éndesn, édem] (1692 -- 1765) – Skota ekonomikisto, aŭtoro de historio de la komerco, siatempe fama.........................................473, 521, 701, 714

**Anderson, James** [éndesn, ĝéjms] (1739 – 1808) – Angla ekonomikisto, antaŭulo de Ricardo en la teorio de rento...........................................................577, 683, 686

**Antipatro** (dua duono de la 2-a jarcento a.n.e.) Greka poeto, aŭtoro de tre spritaj poeziaĵoj...............................................................................................................380

**Apiano** (95 – 160) – Greka historiisto, aŭtoro de *Roma historio*...........................684

Arbuthnot, J.,.......................................................................289, 306p, 680, 684

Arĥiloĥo..............................................................................................................342

**Arĥimedo** (212 – 187 a.n.e.) Greka (en Sirakuzo) matematikisto........................285

**Ariosto, Ludoviko** [Ariosto, Ludovico (1474 – 1533) – Itala poeto; lia plej konata verko estas la „Furioza Rolando”...............................................................................39

**Aristotelo** (384 – 322 a.n.e.) La plej universala inter la antikvaj grekaj filozofoj, kiu „jam esploris la plej substancajn formojn de la dialektika pensado” (Engelso)…63p., 84, 87, 146p., 157, 306, 380

**Arkwright, Sir Richard** (1732 – 1792) – Angla industriisto, al kiu oni atribuis la inventon de multaj ŝpinmaŝinoj, kiujn li tamen plagiatis................355, 395, 399, 456

**Arledge, J. T.** (1832 – 1899) Ĉefkuracisto de la Malsanulejo de North Staffordshire, en Londono.........................................................................................................229

**Ashley A. C.**, grafo Shaftesbury [éŝli; ŝéjfcberi] (1801 – 1885) – Angla konservativa ŝtatisto, unu el la gvidantoj de la filantropiista kampanjo de la dekhorleĝo .........375, 384p., 633

Ashworth.............................................................................................................378

Aspden................................................................................................................230

**Ateneo** (2-a – 3-a jarcento d.n.e.) – greka verkisto, aŭtoro de *La bankedo de la kleruloj*, kiu enhavas citaĵojn el 1.500 perditaj verkoj......................................99, 128

**Augier, Marie** [oĵjé, marí]– Franca ĵurnalistino......................................................715

**Aveling, Edward** [évlin, édved] (1851 – 1898) – Angla socialisto, kuracisto, edzo de la pli juna filino de Markso, Eleanor. Li proksimiĝis al la marksismo sub la influo de Engelso: li laboris en la „Socialdemokrata Federacio” kaj en la „Socialista Ligo”. Li helpis ĉe tradukado al la angla de la volumo 1 de la „Kapitalo”..............................32

**Babbage, Charles** [bébiĝ, ĉálz] (1792 – 1871) – Angla matematikisto kaj meĥanikisto; konstruinto de la unua kalkulmaŝino; aŭtoro de libro pri maŝinoj, en kiu „la granda industrio estas envere komprenata nur el la vidpunkto de la manufaktur-periodo” (Markso).............................................................324, 326p., 350, 364, 377

Bagehot.................................................................................................................65

**Bailey, Samuel** [béjli, sémjl](1791 – 1870) – Angla filozofo kaj ekonomikisto,

kontraŭulo de Ricardo................................................................55, 67, 85, 498, 569

**Baker, R.** [béjke] – Angla fabrikinspektisto...........................281, 372, 397, 418, 667

**Bako** [Bacon, Francis (béjkn, fréncis) (1561 – 1626) – Angla filozofo kaj ŝtatisto, „la vera fondinto de la angla materiismo”, kvankam liaj doktrinoj estas ankoraŭ plenaj de teologiaj malkonsekvencoj; li rompis kun la skolastiko kaj fondis la induktivan logikon.........................................................................................................363, 676p.

Ballard.........................................................................................................438

**Balzako** (Balzac, Honoré de (balzák, onoré de)] (1799 --- 1850) – Fama franca verkisto de realismaj romanoj kun kritiko de la franca burĝa socio........................548

Bankes.........................................................................................................634

**Barbon, Nic.** [báben] (1640 – 1698) Angla ekonomikisto....42pp., 119, 124p., 139p., 576

**Barton, John** [bátn, ĝón] (verkis fine de la 18-a jarcento) – Angla ekonomikisto.590, 632

**Basedow, Johann Bernhard von** [bázedo, jóhan bérnhart fon] (1723 – 1790) – Germana moralisto, sekvanto de la ideoj de Rusoo.............................................456

**Bastiat** [bastjá] (1801 – 1850) – Franca ekonomikisto, liberkomercisto kaj granda malamiko de socialismo............................................................22, 65, 84, 182, 524

Baynes...................................................................................................361, 363

**Bebelo, Aŭgusto** [Bebel, August (bébl, áŭgust)] (1840 – 1913) Unu el la ĉefaj figuroj de la germana laborista movado; granda amiko de Markso, kvankam tiu kelkfoje kritikis liajn oportunismajn devojiĝojn; socialista deputito en la Reichstag dum longaj jaroj kaj unu el tiuj, kiuj plej batalis kontraŭ Bismarko en la epoko de premado kontraŭ la socialismo.....................................................................38

**Beccaria, Cesare Bonesana de** [bekária, ĉésare bonesána] (1738 – 1794) – Itala matematikisto kaj ekonomikisto, fama pro sia verko „La krimo kaj la puno”, en kiu li kontraŭbatalas la mortpunon.......................................................................341

**Bedford, duko de** [bédfod]..........................................................................681

**Beecher-Stowe, Harriet** [bíĉe stóŭv, hériet (1812 – 1896) – Usona verkistino, aŭtoro de la fama romano kontraŭ la sklavismo „La kabano de Onklo Tom”, publikigita en Bostono en 1852..................................................................687

Bell.............................................................................................................260, 622

**Bellers, John** [béles, ĝón] (1654 – 1725) – Angla socialisto kaj ekonomikisto. Lia devizo estis „Kiu ne laboras, tiu ne manĝu”. Li batalis i.a. por la socialisma postulo de kombinita instruado kaj laboro en la lernejoj kaj por sociala sekureco de la laboristo................................................126, 133, 140, 305, 325, 399, 448, 456, 574

Bennet.......................................................................................................511, 561

Benson.........................................................................................................205

**Bentham, Jeremy** [béntm, ĝéremi] (1748 – 1832) – Angla juristo, kreinto de la t.n. utilisma filozofio aŭ utilismo. Markso nomis lin „genio de la burĝa stulteco”................ ..........................................................................................167, 568p., 571

**Berkeley, George** [békli, ĝóĝ] (1685 – 1753) – Irlanda episkopo, reakcia filozofo. Fondinto de skolo de „subjektiva idealismo”, kiu interpretas la mondon kiel dependan de la subjekto kaj reduktas ĉion al la mio. Li neas la „absolutan ekziston de aĵoj percepteblaj per la sensoj per ili mem aŭ ekster la spirito”................314, 331

Indekso de personaj nomoj

Bidaut, J. N....301

**Biese, Franz** [bíze, franc] (1803 – 1895) – Germana filozofo, idealisma....380

**Blackey, Robert** [bléki, róbet] (1795 – 1878) – Angla liberala verkisto kaj filozofo ....679

**Blanke, Detlev** – Germana lingvosciencisto, interlingvisto, kiu grave kontribuis post la dua mondmilito al restarigo de la Esperanto-movado en la Germana Demokratia Respubliko (GDR); la lasta el tri tradukintoj de la „Manifesto de la Komunista Partio" (1990)....602, 718

**Blanqui, Jerôme Adolphe** [blankí, ĵeróm adólf] (1798 – 1854) – Franca ekonomikisto, frato de la revoluciulo Aŭgusto Blankio [Auguste Blanqui]; li esploris la situacion de la laborista klaso en pluraj landoj; en siaj ekonomikaj verkoj li sekvas la sistemon de Say....257

**Blankio, Aŭgusto** [Blanqui, Auguste (blankí, ogíst)] – Franca revoluciulo....316

**Block, Maurice** (1816 – 1901) – Franca ekonomikisto kaj ŝtatisto....23

**Boileau, Étienne** [bŭaló, etjén] (ĉ. 1200 – 1269) – Juĝisto en Parizo, aŭtoro de la fama libro *Livre des Métiers* (Libro de la metioj), kompilaĵo de siaepokaj leĝoj kaj policaj ordonancoj....454, 612

**Boisguillebert, Pierre Le Besant** [bŭagijebér, pjér le bezá] (1646 – 1714) – Franca ekonomikisto; antaŭulo de la fiziokratoj. Kun li komenciĝas la fanca klasika ekonomiko....125, 135p.

**Bolingbroke, Henry St. John** [bólinbrok, hénri sntĝón] (1678 - 1751) Angla ŝtatisto kaj verkisto, partiano de la konservativuloj (*tories*)....711

**Bolton, Harris von** [bóltn, héris fón] (19-a jarcento) – Angla polica ĉefo....429

Boothroyd....228

Boubleday....712

Boulton....352

**Boulton, Math.** [bóŭltn, mátju] (1728 – 1809) – Angla fabrikisto kaj inĝeniero....361

**Boxhorn, Marcus Suerius** [bókshorn, márkus suérius] (1602 – 1653) – Humanista saĝulo kaj poeto....399

**Bray, John Francis** [bréj, ĵón fréncis] (1809 – 1895) – Angla utopia socialisto, ĉartisto....72

**Brentano, L.** [brentáno, l] (1844 – ?) – Germana ekonomikisto; „katedra socialisto" kaj obseda kalumnianto de la marksismo....39p.

**Bright, John** [brájt, ĝón] (1811 – 1889) – Angla politikisto kaj industriisto, kiu apogis kun Cobden la Kontraŭgrenisman Ligon....21, 238, 264, 519, 609, 637, 705

**Brindley, James** (1716 – 1772) – Fama angla inventisto de hidraŭlikaj kontruaĵo ....326

**Broadhurst, J.** – Angla vulgar-ekonomikisto....60

Brodie....260

**Brougham, Henry Peter** [bróm, hénri píte] (1778 – 1868) – Angla juristo kaj ŝtatisto, partiano de la *whigs* (laboristpartio)....714

**Bruckner, John** [brúkne, ĝón] (1726 – 1804) – Angla pastro, el kies verkoj pri la teorio de populacio / loĝantaro Malthus multon plagiatis....576

**Buchanan, David** [bjúkenen, dévid] (1779 – 1848) – Angla ekonomikisto, „granda

kontraŭulo de la fiziokratoj”...............................................................122, 520, 686

**Buchez, Philippe** (/1796 – 1856) – Franca historiisto; burĝa respublikano; li proponis ian „novkatolikan socialismon” inspiritan de Sentsimono..............................698

Bunbury...................................................................................................680

**Burke, Edmund** [bérk, édmint] (1729 – 1797) – Angla liberala politikisto kaj ekonomikisto...............................................................194, 218, 302, 303, 681, 715

**Busiris** – Laŭ la greka legendo, kruela reĝo de Egiptio, kiun Izokrato prezentis kiel kompendio de virtoj.........................................................................................343

**Butler, Samuel** [bátle, sémjŭel] (1612 – 1680) – Angla satira verkisto...................44

Byles...................................................................................................252, 695

**Cairnes, John Elliot** [kérnz, ĵón éljet] (1823 – 1875) – Angla ekonomikisto de la skolo de Rikardo.........................................................................186, 248, 311

Cammell...................................................................................................243

**Campbell, Sir George** [kémpbel, sér ĝóĝ] (1824 – 1892) – Angla oficisto aganta en Hindio...................................................................................................335

**Cantillon, Richard** [kentílen (aŭ: kantijón), riĉet] (1680 – 1734) – Irlanda bankisto, ekonomikisto, demografiisto, reprezentanto de la klasika ekonomiko, inspiris la fiziokratan skolon kaj Adamon Smith.............................................................516, 576

**Carey, Henry Charles** [kéri, hénri ĉálz] (1793 – 1879) – Usona ekonomikisto, kontraŭis la rikardan teorion de la grundrento; komence li estis liberkomercista, poste defendis la dogansistemon...............................................496, 523p., 687, 705

Carli, G. R..................................................................................................308

**Carlisle, Sir A.** [karlájl, sé ...]..........................................................................260

**Carlyle, Thomas** [karlájl, tómes] (1785 – 1881) --- Angla historiisto kaj filozofo. Markso rekonas al li la meriton „esti sin montrinta kontraŭ la burĝaro, en momentoj kiam ties ideoj … komplete subjugis la tutan anglan literaturon”, sed samtempe kondamnis lian reakcian pozicion kontraŭ la laborista klaso, lian „kontraŭhistorian apoteozon de la mezepoko” kaj lian hero-kulton..................................................238

**Cazenove, John** [kezenóŭv, ĝón] (vivis ĉ. 1850) – Angla ekonomikisto, malthus-an .........................................................................187, 298, 487, 528, 539, 556

**Chalmers, Thomas** [ĉámes, tómes] (1780 – 1847) – Skota teologo kaj ekonomikisto, „unu el la fanatikaj malthus-anoj, kiuj vidas nenian alian rimedon kontraŭ la socialaj malbonaĵoj ol la religian edukadon de la laboristaj amasoj”.…147, 155, 576p.

Chamberlain...............................................................................................601

**Cherbuliez, Antoine Elisé**e [ŝerbuljé, antŭán elizé] (1797 – 1869) Svisa politikisto kaj ekonomikisto, disĉiplo de Sismondi..................................................173, 176, 543

**Chevallier, Jean Baptiste Alphonse** [ŝevaljé, ĵan batíst alfóns] (1793 – 1879) – Franca ĥemiisto...........................................................................................232

Child, J...................................................................................................91, 715

**Cicerono, Marko Tulio** (106 – 43 a.n.e.) – Roma advokato kaj politikisto............380

**Clauren, H**., (pseŭdonomo de la germana verkisto **Karl Heun** [kárl hójn] (1771 – 1854) – Direktoro de la oficiala gazeto *Ĝenerala Gazeto de Prusujo* kaj aŭtoro de sentimentalaj rakontoj ..........................................................................209

Indekso de personaj nomoj

Clement.......................................................................................................................91

**Cobbett, W.** [kóbit] (1763 – 1835) – Angla ĵurnalisto, antaŭulo de la ĉartistoj en la batalo por universala voĉdonrajto kaj por la socialaj postuloj de la laborista klaso. „La plej granda politika verkisto de Anglio dum tiu ĉi jarcento”. (Markso)…..269, 678, 710, 712

**Cobden, Richard** [kóbdn, ríĉet] (1804 – 1865) – Angla politikisto kaj industriisto, unu el la gvidantoj de la kampanjo de la Kontraŭgrenista Ligo........21, 238, 264, 637

Cochran.......................................................................................................................444

**Colbert, Jean-Baptiste** [kolbér, ĵan batíst] (1619 – 1683) – Franca ŝtatisto, la plej konsekvenca reprezentanto de la merkantilisma politika ekonomio, konata sub la nomo de *kolbertismo*.......................................................................................712

Colins..........................................................................................573, 651, 726

**Comte, Auguste** [kónt, ogíst] (1798 – 1857) – Franca filozofo kaj sociologo, fundinto de la t.n. pozitivisma skolo........................................................23, 311, 707

**Condillac, Etienne Bonnot de** [kondiják, etjén bonó de] (1715 – 1780) – Franca filozofo, kiu provizis sin parte de materiismaj doktrinoj. Sed lia sesisma filozofio, kiu serĉis la lastan kaŭzon de ĉia kono en la sensoj, kondukis lin al idealismo. Kiel ekonomikisto li sekvis la fiziokratojn...................................................................152p.

**Condorcet, Marie Jean**, [kondorsé, marîĵán] markizo de (1743 – 1794) Franca filozofo, matematikisto, partiano de la fiziokrata skolo. Politike ĝirondisto.............575

Corbet..........................................................................................................144, 549

**Corbon, Claude-Antoine** [klód antŭán] (1808 – 1801) – Franca laboristo, poste diputito. Corbon postulis ampleksan profesian edukadon por la junularo.. ........... 455

**Courcelle-Seneuil, Jean-Gustave** [kursél senéj, ĵangistáv] (1813 – 1892) – Franca komercisto, poste ekonomikisto kaj alta oficisto............................................216, 557

Cowell.........................................................................................................................521

Craig............................................................................................................................136

Crocker de Fontmill......................................................................................................678

**Culpeper, Sir Thomas** [kílpepe, sé tómes] (1578 – 1662) – Angla ekonomikisto, por la industria kapitalo li batalis kontraŭ la uzur-kapitalo.....................................715

**Cuvier, Georges** [kj8vié, ĵórĵ] (1769 – 1832) – Franca naturesploristo. Unu el la fondintoj de la paleontologio (la scienco pri la originoj de la Tero)........................479

**Ĉerniŝevski, Nikolaj** [ĉerniĉévski, níkolaj] (1828 – 1889) – Rusa socialisto, granda kritikanto de la burĝa ekonomiko...................................................................................21

Dalhouise, grafo............................................................................................................690

**Danielson, Nikolaj F.** [daniélson, nikoláj] (pseŭdonomo *Nikolajon,* 1844 – 1918) – Rusa ekonomikisto; dum la jardeko de 1880 – 1890 unu el la ĉefaj teoriistoj de la *narodniki*-movado. Li tradukis rusen la unuan volumon de *La kapitalo*, ĉar Lopatin, la komencinto de tiu traduko, estis malliberigita...........................................105, 482

**Danto** (Dante Alighieri [dánte aligjéri]) (1265 – 1321) – Itala poeto, konsiderata la fondinto de itallingva poezio........................................................................................230

**Darvino** (Darwin, Charles Robert [dávin, ĉálz róbet]) (1809 – 1882) – angla natur-sciencisto. Aŭtoro de la teorio de la evolucio, per kiu li eltrovis la mutacion de la specioj kaj la naturan devenon de la homo. „La verko de Darvino …, natruscienca

bazo de la historia klasbatalo.” (Markso). „Darvino donis la plej fortan baton al la metafizika koncepto de la naturo.” „Mi akceptas de la darvinisma teorio la teorion de la evoluo [„evolucio”], sed konsideras la argumentan metodon uzatan de Darvino (la batalon por ekzistado, la naturan selektadon) kiel la unuan provizoran kaj malperfektan esprimon de ĵus malkovrita fakto … La rilatoj kaj interdependecoj inter la naturaj vivaj kaj mortintaj organismoj implicas ne nur kolizion, sed ankaŭ harmonion, ne nur batalon, sed ankaŭ kunlaboradon”. Darvino ne konsideras, „ke ĉia progreso konkerita en la vojo de organika evoluo estas samtempe malprogreso, ĉar ĝi metas la evoluon en determinitan direkton kaj ekskludas la eblecon de evoluo en multaj aliaj direktoj”. Darvino „transplantas la burĝan ekonomian teorion kaj la teorion de la loĝantaro de Malthus de la socio al la vivanta naturo.” (Engelso) Vd en Esperanto: Karolo Darvin: La origino de specioj. Tradukis Klivo Lendon. – Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2009. 431 paĝoj. (Serio Scienca penso 1.) ISBN 978-90-77066-40-9........................................................................................319

De Foc.........................................................................................................575

**Dedalo** – Figuro de la greka mitaro, arĥitekto kaj skulptisto, konstruinto de la labirinto de Kreto..........................................................................................................380

**De Foe, Daniel** [defó, dénjel] (1661 – 1731) – Angla romanverkisto, aŭtoro de la fama „*Robinson Chrusoe*” (Robinsono Kruso)..............................................135, 269

**Derby, Edward H. Stanley, Lord** [débi, édved sténli, lód] (1826 – 1893) – Angla reakcia ŝtatisto..........................................................................................427

**Desmoulins, Camille** [demulén, kamíj] (1760 – 1794) – Franca politikisto, unu el la impulsintoj de la Franca Revolucio..........................................................698

**Destutt de Tracy, Antoine** [destít de trasí, antŭán] (1754 – 1836) – Franca filozofia verkisto; liberala politikisto kaj ekonomikisto; defendanto de la interesoj de la burĝaro kontraŭ la laborista klaso......................................82, 151, 156, 305, 307, 606p.

**Diderot, Denis** [dideró, dení] (1713 – 1784) – Eminenta franca raciisma filozofo, kapo de la engaĝiĝinta skolo enciklopedia, materiisma kaj ateisma; antaŭulo de la evolu-teorio de Darvino...........................................................................129

**Dietzgen, Josef** (1827 – 1888) – Germana socialista verkisto; amiko de Markso kaj unu el la antaŭuloj de la socialista movado en Nordameriko, kien li elmigris...........22

**Diodoro Sicilia** (dua duono de la 1-a jarcento a.n.e.) – Greka historiisto….138, 219, 318, 343, 478

**Dryden, John** [drájdn, ĝón] (1631 – 1700) – Angla kortuma poeto.......................225

**Ducpétiaux, Édouard** [dikpetjó, edŭár] (1804 – 1868) – Belga ĵurnalisto kaj ekonomikisto; ĝenerala inspektisto de la Malliberejoj kaj Institucioj de Sociala Helpo de Belgio.........................................................................................628, 630

Dudley...................................................................................100, 117, 121

**Duffy, Sir Charles Gavan** [dáfi (aŭ: defí), sé ĉalz gévn] )1816 – 1903) – Gvidanto de la fenianoj aŭ de la maldekstra revolucia alo de la irlandaj sendependistoj. Li elmigirs al Aŭstralio kaj tie fariĝis membro de la registaro. ..........................230, 727

Dumont.......................................................................................................569

**Dunning, T. J.** [dáning] (1799 – 1873) – Teoriulo de la angla sindikata movado; disĉiplo de Adam Smith; fondinto kaj direktoro de Internacia Kompanio de Asekuro; reprezentanto de la burĝa laborist-politiko; prezidanto de la sindikato de librobindistoj..........................................................................512, 515p., 715

**Dupont, Pierre** [dipón, pjér](1821 – 1870) – Franca poeto, aŭtoro de diversaj poemoj pri la vivo de la laboristoj, pro kio li estis dum certa tempo persekutata de Napoleono la 3-a......................................................................................651

**Eden, Sir Frederick Morton** [ídn, sé frédrik mótn] (1766 – 1809) – Angla ekonomikisto, unu el la ĉefaj disĉiploj de Adam Smith; fondinto kaj direktoro de internacia asekur-kompanio.......................................................................................................................227, 560p., 575p., 632p., 679, 682, 684p., 712p., 715

**Eduardo la 3-a** (1312 – 1377) Reĝo de Anglio (1327 – 1377)........................96, 695

**Eduardo la 6-a** (1537 – 1553) – Reĝo de Anglio kaj Irlando (1547 – 1553)……691p.

Elizabeto .......................................................................................692p., 695

Ellis..............................................................................................................243

Embleton......................................................................................................620

**Emery, Charles Edward** (nask. 1838) – Usona inventisto, perfektigis la maŝinon por malbuligi kotonon.....................................................................................357

**Engelso, Frederiko** (Friedrich Engels [frídriĥ éngels] (1820-- 1895) Germana industriisto, plej densa amiko kaj kunlaboranto de Karlo Markso.................................. . .48, 53, 146, 157, 202, 223, 228, 237, 271, 282, 316, 329, 362, 369, 372, 394, 396, 401, 415, 422, 432, 458, 483p., 495, 558, 565, 587, 593, 610, 613, 681

**Ensor, George** [énse, ĝóĝ] (1769 – 1848) – Angla verkisto, luktis kontraŭ la subpremado de Irlando fare de Anglio..................................................................687

**Epikuro** (341 – 270 a.n.e.) – Eminenta greka filozofo. Lia materiisma filozofio baziĝas sur la atomteorio de Demokrito..................................................................81

**Esavo**, frato de Jakob, figuro de la Malnova Testamento (Biblio)..................252, 545

**Eschwege, Wilhelm Ludwig** [éŝvege, vílhelm lúdviĥ] (1777 – 1855) – Germana ministo; li verkis pri la kuŝejoj de diamantoj kaj oro de Brazilo................................47

Evans, N. H. ...................................................................................................681

Everet [éveret] (18-a jarcento) – Angla inventisto ................................................398

**Fairbairn, Sir William** [férbern, sé ŭíljem] (1789 – 1874) – Skota industriisto; inĝeniero kaj inventisto; unu el la unuaj kiuj konstruis ŝipojn el fero......................407

Farre..............................................................................................................260

**Faulhaber, Johann** [fáŭlhaber, jóhan] (1580 – 1635) – Germana matematikisto..............................................................................................................351

**Fawcett, Henry** [fóset, henri] (1833 – 1884) – Angla ekonomikisto kaj filantropo, liberala ŝtatisto, partiano de John Stuart Mill..............................519, 570p., 612, 705

**Ferguson, Adam** [férgusen, édem] (1723 – 1816) – Skota filozofo kaj histroiisto, partiano de Hume kaj instruisto de Adam Smith.........................119, 331, 337, 338p.

**Ferran**d [férent (aŭ ferá)] – Deputito en la angla parlamento........................388, 534

**Ferrier, E. L. A.** [ferié] (1767 – 1861) – Franca ekonomikisto, kiun Markso nomis „defendisto de la napoleona sistemo de malinstigaj doganaĵoj”; pri li kaj pri Ganilh li diras, ke ili estas „la ekonomikistoj de la imperio”, parolante pri la napoleona imperio...........................................................................................................65

**Fichte, J. G.** [fíĥte] (1762 – 1814) – Germana filozofo; antaŭulo de Hegelo en la historio de la dialektiko............................................................................................58

**Fielden, John** [fíldn, ĝón] (1784 – 1849) – Granda angla industriisto kaj politikisto;

defendis la dekhorleĝon..........................................................................375, 384, 713

**Fleetwood, William** [flítŭud, ŭíljem] (1656 – 1723) – Angla episkopo, verkisto kaj partiano de la liberaluloj (*whigs*)..............................................................................253

Fonteret.................................................................................................................339

**Forbonnais, François Veron de** [forboné, frasŭá veró de] (1722 – 1800) – Franca financisto kaj ekonomikisto; merkantilisto kaj defendanto de la dogansistemo; li kontraŭis la fiziokratojn...........................................................................................91

**Forster, Nathaniel** [fóste, neténjl] (ĉ. 1726 – 1790) – Angla dominikano kaj ekonomikisto...................................................................255, 399, 479, 621, 682p.

**Fortescue, Sir John** [fóteskju, sé ĝón](1384 – 1476) – Juristo kaj alta juĝisto de Anglio.............................................................................................................675p.

**Franklin, Benjamin** [frénklin, bénĝemin] (1706 – 1790) – Usona politikisto kaj ekonomikisto, la plej eminenta reprezentanto de la raciismo en Nordameriko.……57, 158, 307, 578p...................................................................56, 157, 306, 575p.

**Frederiko la 2-a** („la Granda”) (1712 – 1786) – Reĝo de Prusio, de 1740 ĝis 1786. Sperta kaj senskrupula politikisto, preparis la unuan dividon de Pollando. Kiel amiko de literaturo li altiris Volteron kaj aliajn francajn filozofojn......................675, 689, 702

**Freytag, Gustav** [frájtaĥ, gústaf] (1816 – 1895) – Germana romanverkisto, realisma, idealigis en siaj verkoj la burĝaron kaj artmetion...................................696

**Fullarton, John** [fúlatn, ĝón] (1780 – 1849) – Angla ekonomikisto de la tiel nomata „banka skolo”, al kiu ŝuldiĝas la kritiko de la „teorio de la monkurzo”. . .124, 136, 139

**Fulton, Robert** [fúltn, róbet] (1756 – 1815) – Usona inĝeniero; unue laboristo pri juveloj, poste pentristo de portretoj kaj pejzaĝoj, li inventis la vaporŝipon.............456

**Furiero** (François Charles Fourier [frasŭá ŝárl furĵé], 1772 – 1837) – Franca utopia socialisto. „En Furiero ni renkontas akran kritikon, aŭtente francan, sed pro tio ne malpli tranĉan, de la ekzistantaj sociaj institucioj. Li senkompate nudigas la materian kaj moralan mizeron de la burĝa mondo.” (Engelso)..............................................................357, 397, 653

**Galiani, Fernando** […] (1728 – 1787) – Itala pastro kaj diplomato, ekonomikisto defendanta la merkantilismon kaj kontraûanta la fiziokratojn…77, 90p., 99, 148, 152, 295, 602

**Galiani, Fernando** […] (1728 – 1787) – Itala pastro kaj diplomato, ekonomikisto defendanta la merkantilismon kaj kontraûanta la fiziokratojn......65, 83, 93, 165, 171, 418

Garnier...........................................................................................................339, 513

**Gaskell, Peter** [géskil, píte] – Liberala kuracisto de Manĉestro, aŭtoro de la verko titolita „La manufaktura loĝantaro de Anglio”............................................406p., 415

**Genovesi, Antonio** [ĝenovési, antónjo] (1712 – 1769) – Itala teologo kaj filozofo, disĉiplo de Locke; li estis la unua profesoro pri politika ekonomio de Italio; merkantil-isto.......................................................................................................................147

**Geoffroy de Saint-Hilaire, Étienne** [ĝofrŭá de sentilér, etjén] (1772 – 1844) – Franca natursciencisto.....................................................................................701

**Georgo la 2-a** (1683 – 1760) – Reĝo de Britio kaj Irlando kaj „elektisto” de Hanovro (1727 – 1760).. Li perdis la britajn koloniojn en Ameriko kaj batalis kontraŭ la Franca Revolucio..........................................................................46, 96, 696

Indekso de personaj nomoj

**Georgo la 3-a** (1738 – 1820) – Reĝo de Britio kaj Irlando (1760 – 1820) kaj de Hanovro (1815 – 1820) ....................696

**Gerhardt, Charles Frédéric** [ĵerár, ŝarl frederík] (1816 – 1856) – Prestiĝa franca ĥemiisto....................289

Gillott....................431

Gisborne....................713

**Gladstone, William** [glédston, ŭíljem](1809 – 1898) – Angla ŝtatisto....................37pp., 422, 610pp., 697

Gobseck....................549

**Godunov, Boris** ([godúnov, barís] 1552 – 1605) – Rusa caro, regis de 1598 ĝis 1605, murdita de Dimitri, falsa filo de sia bofrato Fedor....................680

**Goeto** (Johann Wolfgang Goethe [jóhan vólfgang géte] (1749 – 1832) – Unu el la plej famaj germanaj verkistoj. Plej konataj verkoj: La suferoj de la juna *Werther*; Faŭsto [ambaŭ en E-o -vl]....................87, 553, 668, 671

**Gottsched, Johann Christoph** [gótŝed, jóhan krístof] (1700 – 1766) – Germana verkisto, dramisto kaj literaturteoriisto en la frua klerec-epoko....................203

**Gray, J.** [gréj] (1798 – 1850) – Angla utopia socialisto, disĉiplo de Oveno. Li pretendis solvi la socialan problemon per utopio bazita sur interŝanĝo kaj konsistanta en la kreado de „labormono”....................72, 154

**Greenhow** [grínhoŭ] (1814 – 1888) – Angla sociala kuracisto kaj higienisto.....228p., 273, 389

**Greg, R. H**. [grég] (1795 – 1875) – Angla fabrikisto kaj ekonomikisto, vulgara liberkomercisto ....................271

Gregoir....................517

**Grey, Sir George** [gré, sé ĝóĝ] – Angla ministro pri internaj aferoj....................623

**Grove, William Robert** [gróŭv, ŭíljem róbet] (1811 – 1896) – Angla juĝisto kaj esploristo pri elektroĥemio....................490

**Gülich, Gustav von** [gjúliĥ, gústaf fon] (1791 – 1847) – Germana m historiisto pri ekonomiko....................20, 709

Guthrie....................260

**Haller, Karl Ludwig von** [háler, kárl lúdviĥ fón] (1768 – 1854) – Svisa reakcia verkisto kaj ekonomikisto....................363

Hamilton, Sir W....................301

**Hamm, Wilhelm von** [hám, vílhelm fón] (1820 – 1880) – Germana verkisto kaj kampkultura entreprenisto....................471

Hansard....................37pp.

**Hanssen, George H.** [hénsn, ĝóĝ] (1809 – 1894) – Angla statistikisto kaj historiisto pri ekonomio....................220

**Hardwicke, William** [hárdŭike, ŭiljem] – Angla kuracisto kaj higienisto....................460

**Harris, James** [héris, ĝéjmz], grafo de Malmesbury (1746 – 1820) – Angla diplomato....................341

Harrison....................676, 699

Harrupp....................396p.

Harvey....................................................................................................................644

**Hastings, Warren** [héjstings, ŭóren] (1732 – 1818) – Brita administristo, ĝenerala guberniestro de Hindio (1774 – 1785)..................................................................708

Haynes....................................................................................................................241

**Hefajsto** (ankaŭ: Hefesto)– En la greka mitaro, dio de la fajro kaj de forĝado.....380, 604

**Hegelo** (Georg Wilhelm Friedrich Hegel [géork vílhelm frídriĥ hégel], 1770 – 1831) – Eminenta reprezentanto de la germana klasika filozofio; esplorinto de la dialektiko kaj la unua kiu aplikis ĝin konscie. „La moderna germana filozofio atingis sian finon en la sistemo de Hegelo, en kiu por la unua fojo – kaj tio estas lia granda merito – la tuta natura, historia kaj spirita mondo montriĝas kiel procezo." (Engelso)..23, 25, 50, 91, 113, 161, 170, 244, 289, 544, 548, 556

**Hejno, Henriko**, (Heinrich Heine [hájnriĥ hájne], 1797 – 1856) – Granda germana poeto kaj satiristo, amiko de Markso, sub kies influo li verkis ne malmultajn poemojn favore al la subprematoj kaj kontraŭ la subpremantoj...................................282, 569

**Helvetius** [elvesijús]...........................................................................................569

Henderson...............................................................................................................443

**Henriko la 3-a** (1207 – 1272) – Reĝo de Anglio (1216 – 1272)...........................127

**Henriko la 7-a** (1457 – 1509) – Reĝo de Anglio de 1485 ĝis 1509............676p., 691

**Henriko la 8-a** (1491 – 1547) – Reĝo de Anglio de 1509 ĝis 1547.......676, 691, 693

**Heraklito de Efeso** (540 – proksimume 475 a.n.e.) – Greka filozofo, unu el la grandaj dialektikistoj de la antikveco. Li aktivis en la partio de la nobelaro............104

**Herkulo** (ankaŭ: Heraklo) – Pragreka mita nacia heroo, fama pro sia forto, kiu meritis diajn honorojn kaj estis akceptita en la Olimpo. Li estis dio de kuracado kaj de orakolo, protektisto de la sportejoj kaj palacoj, protektata de la diino Ateno....395, 552

**Hironimo** (Sophronius Eusebius Hieronymus [sofrónius eŭsébius hierónimus]) (347 – 420) – Eklezia patro, sanktulo , klerulo kaj instruisto de la malnova ekzlezio. Li aparatenas kun Ambrosio de Milano, Aŭgusteno kaj la papo Gregoro la 1-a al la kvar ekleziaj instruistoj de la malfrua entikveco..................................................101p.

**Hobbes, Thomas** [hóbz, tómes] (1588 – 1679) – Angla filozofo, disĉiplo de Bako, argumentas kontraŭ la religiaj antaŭjuĝoj de Bako; favoras la absolutan monarĥion ........................................................................................162, 333, 363, 576

**Hobhouse, Sir John Cam** [hóbhaŭs, sé ĝón kém] (1786 – 1869) – Anlga liberala ŝtatisto....................................................................................................................269

**Hodgskin, Thomas** [hóĝskin, tómes] (1787 – 1869) – Angla ekonomikisto, kies verkoj konsidereblas, laŭ Markso, inter la plej gravaj produktoj de la angla ekonomiko. Unu el la reprezentantoj de la antagonisma laborista tendenco de la klasika skolo, kvankam ne libera de la influo de Ricardo......318, 330, 332, 499, 534, 706

**Holinshed** [hólinŝid] (mortis en 1580) – Historiisto de la angla monarĥio.............693

**Homero** – Greka poeto al kiu oni atribuas la *Iiado*-n kaj la *Odiseado*-n, verkoj el la 10-a jarcento a.n.e.........................................................................................66, 341

**Hopkins, Thomas** [tómes hópkins] (liaj verkoj aperis inter 1810 kaj 1860) – Angla ekonomikisto. Li vidis en la grundrento la nepran konsekvencon de ties

monopolo........................................................................................................14

**Horner, Francis [hóne, frénsis] (1778 – 1864) – Angla ekonomikisto; en 1815 li apogis la postulon ĉesigi la papermonon........................................................713**

**Horner, Leonard** [hóne, líonat] (1785 – 1864) – Angla geologo; li aktive partoprenis en la fondo de la londona universitato. En sia posteno kiel fabrikinspektisto, al kiu li estis nomumita de la registaro, li ĉiam defendis decide kaj neinfluate la interesojn de la laborista klaso

..............................210, 224p., 258, 262, 265, 268, 270, 275, 372p., 385p., 398, 513

**Houghton, John** [háŭten, ĝón] (mortis en 1705) – Angla ekonomikisto, apotekisto kaj komercisto........................................................................................................399

**Howell** – Angla fabrikinspektisto........................................................................270p.

**Howitt, William** [hóŭit, ŭíljem] (1791 – 1879) – Angla verkisto, aŭtoro de verkoj pri la unuaj loĝantoj de Aŭstralio...................................................................................707

**Hume, David** [júm, dévid] (1711 – 1776) – Angla filozofo, agnostikisto. Li neas la eblecon ekkoni la mondon, asertante ke la homo havas nur sensacojn de la aĵoj. Kiel ekonomikisto li estis kontraŭ la merkantilistoj kaj malkonsekvenca apoganto de liberkomerco..........................................................................119, 516, 576p.

**Hunter, Henry Julian** [hánte, hénri ĝúljen]– Angla kuracisto.......371, 617pp., 624p., 637, 640, 642pp., 650p., 678

**Hutton, Charles** [hátn, ĉálz] (1737 – 1823) – Angla matematikisto.......................346

**Huxley, Thomas Henry** [háksli, tómes hénri] (1825 – 1895) – Angla naturesploristo, biologiisto; esplorris en la kampoj de zoologio kaj antropologio. Li estis fama vulgariganto de la natrursciencoj kaj defendis la darvinan evolu-teorion. Partiano de Hume kaj de ties agnostikismo...........................................................451

**Isokrato** (436 – 338 a.n.e.) – Greka instruisto pri retoriko....................................343

**Jakobo**, persono de la Malnova Testamento de Biblio, frato de Esavo, kiun li tromp-is per lenta manĝaĵo..........................................................................................252

**Jakobo la 1-a Stuart** (1566 – 1625) – Reĝo de Anglio de 1603 ĝis 1625. Li distingiĝis per sia rigoro kaj la persekutoj kontraŭ la disdentoj..............679, 693, 696

Jay.........................................................................................................................623

**Jesuo (de Nazareto)**, ĉefa figuro de la kristana Nova Testamento (kies reala persono la historiistoj ne unuanimas, sed kies arbitre fiksita naskiĝdaton la kristana eklezio konsideris la komenco de la tempkalkulo (jaro 1 de nia erao), konsiderata de la judoj kiel profeto, de la kristanoj kiel filo de Dio kaj kiel la Savanto de la homaro el la prapeko........................................................................................................149

**Johano, reĝo de Francio** („la Bonulo") (1319 – 1364) – Reĝo de Francio (1354 – 1364). Li estis venkita en la batalo ĉe *Poitiers* [pŭatjé] de la Nigra Princo, militkaptita, kaj liberigita interŝanĝe kun lia forcedo de la provinco Akvitanio al Anglio. [laŭ Encikl. Larousse, hisp.]..........................................................................695

Jones.....................................................................................36, 289, 529, 547, 557, 591

**Jones, Richard** [ĝóŭnz, ríĉet] (1790 – 1855) – Angla ekonomikisto; li distingiĝas per „la sento de la historiaj diferencoj inter la diversaj produktad-sistemoj" (Markso). Elirante de la antagonismo inter la „posedantoj de la akumulanta riĉaĵo" kaj la „veraj laboristoj", li deduktas la necesa ruiniĝo de la kapitalismo....................301, 308, 312

**Kalb, von**, [kálp, fón] kortega marŝalo, figuro de dramo de Ŝilero........................535

**Karlo la 1-a** (1600 – 1649) – Reĝo de Anglio de 1625 ĝis 1649. En la revolucia interna milito de la naskiĝanta burĝaro kontraŭ la feŭda despotismo, Kromvelo kaptis lin kaj akuzis lin antaŭ la parlamento. Li estis senkapigita en *White Hall [ŭájt hól]*......678

**Karlo la 2-a** (1630 – 1685) – Reĝo de Anglio, Skotlando kaj Irlando (1660 – 1685) ......121

**Karlo la 10-a** (1622 – 1660) Reĝo de Svedio, de 1654 ĝis 1660......681

**Karlo la 11-a** (1655 – 1697) – Reĝo de Svedio de 1660 ĝis 1697......681

**Karlo la Granda** (Karlo la 1-a, 724 – 814) – Reĝo de la frankoj kaj imperiestro de ......684

**Karlo la 5-a** (1500 – 1558) – Reĝo de Hispanio kaj imperiestro de Germanio de 1519 ĝis 1556. Li sange sufokis la ribelon de la komunumanoj de Kastilio, kiuj leviĝis kontraŭ li defendante siajn liberecojn......693

Kars......120

**Kartezio** [Descartes, René [dekárt, rené]) (1596 – 1650) – Eminenta franca filozofo kaj granda matematikisto. Fondinto de la analiza geometrio. En lia metafiziko jam disvolviĝis la rudimentoj de meĥanika materiismo. Lia meĥanika koncepto de la organika mondo kaj de la homo estas la filozofio karakteriza de la manufaktura periodo......363

**Katarino la 2-a** (1729 – 1796) – Imperiestrino de Rusio de 1762 ĝis sia morto. Ŝi regis alterne per sia malordema konduto, perforta despotismo por subpremi la popolon kaj protektado de la kleruloj kaj filozofoj de sia kortego......642

Kaufmann......23

Keller, Gottfried [kéler, gótfrit] (19......63

Kelson......623

Kent......683

Kincaid......373

**Kirchmann, Julius Hermann von** [kírĥman, július hérman fon] (1802 – 1884) – Germana juristo, politikisto kaj filozofo......495

Kolumbo, Kristoforo (Cristóbal Colón [kristóbal kolón]) (1450 [aŭ 1451] – 1506) – Komisie de la krono de Hispanio serĉis marvojan aliron al ......127

Kopp......289

**Krause, Erich Dieter** [kraŭze, eriĥ díter] Germana lingvosciencisto kaj Esperanta vortaristo, aŭtoro de i.a. Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto (Granda vortaro germana-Esperanto)......47p.

**Kromvelo** (Oliver Chromwell [ólive krómvel], 1599 – 1658) – Angla ŝtatisto gvidanto de la burĝa revolucio de Anglio; poste „*Lord-Protector*" (ŝtatestro) de la Angla Respubliko, de 1653 ĝis 1658......678, 704

**Krupp** [krúp] – Germana familio de ŝtalindustriistoj......363

**Ksenofono** (425 – 352 a.n.e.) – Greka generalo kaj historiisto, disĉiplo de Sokrato ......342p.

Kugelmann......19

La Châtre......27

**Laborde, Alexandre** [labórd, aleksándr] (1774 – 1842) – Franca arĥeologo kaj

vojaĝisto, batalis flanke de Aŭstrio kontraŭ la Franca Revolucio. Post la restaŭrado li okupis gravajn politikajn funkciojn. Li verkis plurajn librojn pri politika ekonomio 496

**Laing, Samuel** [léjng, sémjŭel] (1780 – 1868) – Angla verkisto kaj vojaĝisto, aŭtoro de diversaj libroj pri la politika, ekonomia kaj socia situacio de la eŭropaj ŝtatoj.....602, 617

**Lancellotti** [lanĉelóti] (verkis libron en 1629) – itala abato.....399

**Lasalo, Ferdinando** [Lassalle, Ferdinand (lasál, férdinant)] (1825 – 1864) – Fondinto de la Ĝenerala Ligo de Germanaj Laboristoj. Ĉe lia morto Engelso skribis, referencante lin: „Unu el la plej gravaj figuroj de Germanio. En la aktualeco li estis, por ni, amiko sufiĉe malcerta, kiu poste devis transformiĝi sendube en plej certan malamikon.” Post pli detala scio pri liaj rilatoj kun Bismarko, Markso formulis pri li ankoraŭ pli akran juĝon: „Lasalo vere perfidis la partion. Li faris formalan interkonsenton kun Bismarko.” Engelso diris, ke „la tut merito de Lasalo baziĝis sur tio, ke Markso permesis al li ornami sin dum multaj jaroj per la fruktoj de liaj esploraĵoj kvazaŭ ili estus liaj propraj, kaj krome, falsi ilin. La socialiston Lasalo akompanis ĉiam, kiel ombro al korpo, Lasalo la demagogo.”.....15, 104

**Lasker, Eduard** [lásker, éduart], kromnomata *Laskerchen* (1829 – 1884), Elstara politikisto de la germana liberala burĝaro; direktoro de gazeto de Breslaŭo .....38

Lauderdale.....326

**Laurent, Auguste** [lorán, ogjúst] (1807 – 1853) – Franca ĥemiisto.....289

**Lavergne, Louis** [lavérnj, luí] (1809 – 1880) – Franca reakcia politikisto kaj ekonomikisto.....471, 495p., 670

**Law, John** [ló, ĝón] (1671 – 1729) – Skota financisto kaj ekonomikisto. En 1716 li fondis en Parizo, en formo de akci-societo, bankon al kiu la ŝtato donis la privilegion emisii papermonon. En 1720 liaj societoj bankrotis.....91, 576

**Le Chapelier, Isaac, René Guy** [le ŝapeljé, izaák, rené gí] (1754 – 1794) – Franca politikisto. Elmigris al Anglio, fuĝante antaŭ la Revolucio; ĉe sia reveno li estis mortkondamnita kaj ekzekutita. Li redaktis la kontraŭlaboristan leĝon kiu portas lian nomon.....698

**Le Trosne, Guillaume François** [letrón, gijóm frasŭá] (1728 – 1780) – Franca ekonomikisto de la „fiziokrata” skolo.…43, 91, 100, 109, 113, 116, 140, 151pp., 156, 197

Leach.....230

**Lee** ]lí], d-ro, oficisto pri sano en Manĉestro.....600

**Lesingo** [Lessing, Gotthold Efraim (lésink, gótholt éfraim] (1729 – 1781) – Germana verkisto kaj recenzisto.....25

Letheby.....237

**Levi, Leone**, profesoro.....690

**Liebig, Justus von** [líbiĥ, jústus fon] (1803 – 1873) Eminenta germana natursciencisto kaj ĥemiisto, kies esploraĵoj estis epokfaraj, precipe koncerne la aplikadon de ĥemio al kampkulturo (sterkado ktp).....222, 307, 359, 472p., 533

**Liebig, Justus von** [líbiĥ, jústus fón] (1803 – 1873) – Germana ĥemiisto, progresigis la organikan ĥemion en Germanio. .....307

Lightbourne.....230

**Likurgo** (9-a jarcento a.n.e.?) – Mita greka leĝdonanto, al kiu oni atribuas la server-

ajn instituciojn de Sparto......................................................................................395

**Linguet, Simon Nicolas Henri** [lengé, simó nikolá harí] (1736 – 1794) – Franca verkisto, kiu batalis „kontraŭ la burĝaj kaj liberalaj ideoj de sia raciisma epoko kaj kontraŭ la naskiĝanta erao de la burĝaro”. (Markso).............................217, 575, 695

**Locke, John** [lók, ĝón] (1632 – 1704) Angla filozofo. Kiel ekonomikisto li reprezentis la interesojn de la nova burĝaro en ĉiaj formoj.......43, 91, 100, 121, 145, 363, 576

**Longe, F. D.** [lónĝ] (19-a jarcento) – Angla fabrikinspektisto (komisaro).......425, 452

**Louis-Philippe** [luí filíp] (1773 – 1850) – Reĝo de Francio (1830 – 1848) – Li partoprenis en la Franca Revolucio, poste elmigris kaj revenis al Francio kun la restaŭrado. Post la revolucio de 1830 li estis proklamita reĝo. La revolucio de 1848 igis lin abdiki kaj fuĝi al Britio...........................................................................................259

**Ludoviko la 14-a** (1638 – 1715) – Reĝo de Francio de 1643 – 1715. Lia regado estis la pratipo de absoluta monarĥio; li konsideris sin monarĥo pro dia rajto kaj disvolvis en sia kortego (Versajlo) splendon poste imitatan de aliaj eŭropaj reĝoj. ...............................................................................................................................135

**Ludoviko la 16-a** (1754 – 1793) – Reĝo de Francio de 1774 ĝis 1793; dum lia regado eksplodis la Franca Revolucio, kiu ekzekutis lin kaj lian edzinon Maria Antonia (*Marie Antoinette*) .........................................................................................693

**Lukiano** (proksimume 125 – 180) – Greka satira poeto.......................................577

**Lutero, Marteno** (Martin Luther [mártin lúter], 1483 – 1546) – Centra figuro de la germana religia movado konata kiel reformacio. Li reprezentis la protestantan tendaron de la modera burĝa reformo (de la urba burĝaro, la malalta nobelaro kaj parto de la princoj). En la milito de la germanaj kamparanoj li aliĝis al la kontraŭrevolucia katolika tendaro (al la centra potenco de la Imperio, al la eklezia potenco kaj al parto de la princoj, al la riĉa nobelaro kaj al la urbaj patricioj) kontraŭ la revolucia tendaro (la kamparanoj kaj urbaj plebaroj) gvidataj de Thomas Münzer. [tómas míncer]..........................................................130, 182, 254, 290, 552p., 709

**Macaulay, Thomas** [mekóli, tómes] (1800 – 1859) – Angla historiisto, de liberala ideologio...........................................................................254, 258, 674, 679

**MacCulloch, John Ramsay** [mikkílok, ĝón rémsi] (1789 – 1864) – Angla ekonomikisto, disvastigis „la ekonomikon de Ricardo kaj samtempe la plej plorindan ateston de ĝia disfalo […] Apologiisto de la ekzistanto. La sola afero, kiu ĉagrenas lin ĝiskomike, estas la tendenca falo de la profito; la situacio de la laborista klaso vekas en li eĉ ne la plej etan zorgon, kiel neniu el la kontraŭdiroj de la burĝa ekonomio kiuj pezas sur la laboristoj. […] Liaj lastaj verkoj pri la mono, la impostoj ktp, estas simplaj pledoj defendante la ministron de la *whigs*, kiuj estis en la potenco kiam li verkis ilin. Danke al ili, li ricevis postenojn kun sufiĉe alta pago”. (Markso).........................139, 145, 147, 182, 255, 301, 380, 409, 412, 486, 567, 569

**Maclaren, James** [mekléren, ĝéjmz] – Skota ekonomikisto...................................97

**Macleod, Henry** [meklíod, hénri] (1821 – 1902) – Skota ekonomikisto...........65, 148

Maksimiliano...........................................................................................................160

**Malthus, Thomas Robert** [máltis, tómes róbet] (1766 – 1834) – Angla pastro kaj ekonomikisto; „lerta plagiatisto”. Lia vera merito „konsistas en tio, ke li atentigis pri la malegaleca distribuado inter kapitalo kaj dunglaboro”. Sed li faras tion „unuflanke por montri la mizeron de la laborantaj klasoj kiel ion necesan […] kaj aliflanke por konvinki la kapitalistojn ke nepras la ekzisto de bone provizita eklezia kaj burokrata

pastraro …” Li konsilas al la proletaro kiel panaceon kontraŭ la kapitalisma mizero, limigi la nombron de siaj idoj.155, 199, 294, 473, 492, 518, 528, 533, 539, 547p., 555, 557, 567, 569, 575p., 593, 606, 662, 667

**Mandeville, Bernard de** [mendevíl, bénet de] (1670 – 1735) – Angla kuracisto kaj satiristo. Li primokas la burĝajn hipokritecon, abstinencon kaj moralon. „Senlime pli aŭdaca kaj pli honora ol ĉiuj apologiismaj filistroj de la burĝa socio”. (Markso)….332, 574, 576

**Markso, Karlo** (Marx, Karl [márks, kárl] (1818 – 1883) – La aŭtoro de tiu ĉi verko. Germana filozofo, ekonomikisto kaj politikisto. Kiel materiisto, ateisto kaj progres-emulo li ellaboris sian interpreton de la historiaj kaj sociaj faktoj (historia materiismo) el triopa inspiro: filozofia (Hegelo), politika (francaj socialistaj teoriuloj) kaj ekonomia (brita politika ekonomio). Kune kun Frederiko Engelso li ellaboris la *Manifeston de la Komunista Partio* (1848) kaj kunorganizis la asocion de la internacia laboristaro, la *Unuan Internacion.* Lia teoria kaj praktika laboro, kune kun tiu de sia amiko Engelso, fariĝis ege influa en la internacia laborista movado kaj estas, kune kun postaj kaj kun aktualaj teoriistoj, kiuj uzas lian metodon, nomata marksismo.......495, 573, 579, 604, 651

**Markso, Eleanor** [Marx, Eleanor (márks, elíanor] (1856 – 1898) – Pli juna filino de Karlo Markso, edzino de la angla socialisto kaj kuracisto Edward Aveling. Ŝi aktive partoprenis en la angla kaj internacia laborista movado kaj intervenis en la organizado de la sindikato de gaslaboristoj de Londono kaj en la londona laborista virina movado. Ŝi tradukis al la angla multnombrajn socialistajn verkojn........36, 39p.

Marshall, Wm.........................................................................................327

**Martineau, Harriet** [matinó, herjet] (1802 – 1876) – Angla verkistino, propagandis la doktrinojn de Malthus kaj de Bentham..............................................................594

Maudslay...............................................................................................358

**Maurer, Georg Ludwig** [máŭrer, géorg lúdviĥ] (1790 – 1872) – Historiisto pri germana juro. En siaj esploraĵoj li demonstras detale, ke la privata proprieto pri grundo estas produkto de la historio. „Liaj libroj havas eksterordinaran gravecon.” (Markso). Markso kaj Engelso emfazas jam en la *Manifesto de la Komunista Partio* la gravecon de la verkoj de tiu aŭtoro. [Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlef Blanke (k.a.), Monda Asembleo Socia, 2011, p. 43.]........................................................................75

Mayer.......................................................................................................19

McBean...................................................................................................228

**Meitzen, August** [májcen, áŭgust] (1822 – 1910) – Statistikisto kaj ekonomikisto, aŭtoro de verkoj pri kampkulturo.............................................................................220

Mendelssohn, Moses................................................................................25

Menenio Agripo.......................................................................................337

**Mercier de la Rivière, Paul Pierre** [mersjé de la rivjér, pól pjér] (1720 – 1794) – Franca ekonomikisto, fiziokrato. Markso diris pri li, ke li havas „ideon pri tio, ke, almenaŭ en la industrio, la plusvaloro … havas ion komunan kun la industriaj laboristoj”..........................................................107p., 126, 142, 144, 151, 154, 181

**Merivale, Hermann** [mérivel, hérmen] (1806 – 1874) – Angla ŝtatisto kaj ekonomikisto, teoriulo pri la koloniigo...........................................................593, 724

metabolo socia......................................................................................103p.

Metthewman............................................................................................................241

**Meyer, Rudolf** [májer, rúdolf] (1833 – 1899) – Eldonisto de Rodbertus. Feŭda socialisto; kontraŭulo de Bismarko kaj konato de Engelso............................222, 495

**Mill, John Stuart** [mil, stjúet] (1806 – 1873) Angla filozofo kaj ekonomikisto kiu reprezentis en la vulgara ekonomiko la repacigan tendencon…..21p., 111, 120, 129, 346,409, 473, 481, 483, 527, 550, 556, 559, 569, 570, 705

**Mill, James** [mil, ĝems] (1773 – 1836) – Angla historiisto, filozofo kaj ekonomikisto. „La unua kiu sisteme demonstris la teorion de Ricardo.” Per siaj provoj forigi la kontraŭdirojn de la teorio de Ricardo li mem enretiĝis en kontraŭdirojn, kaj liaj provoj solvi tiujn signas samtempe la ekkadukiĝon de la teorio, kiun li dogmece reprezentis......................................................................148, 176, 187, 330, 409, 473

**Mirabeau, Honoré, grafo de** [mirabó, onoré] (1749 – 1791) – Politikisto de la Franca Revolucio. Spite al sia nobeleco li aliĝis al la burĝaro kaj fariĝis givdanto de tiu nova socia klaso. Fama oratoro. Li pledis por konsitucia monarĥio. 446, 675, 689, 703, 712

**Mirabeau patro** (Victor R. de Mirabeau [mirabó], 1715 – 1789) – Franca ekonomikisto, fiziokrato, defendis la feûdismon. Por distingi lin disde la politikisto Mirabeau, lia filo, Markso nomis lin *Mirabeau patro.*............................. .............................720

**Moliero** (Jean-Baptiste Poquelin, nomata Molière [ĵabatíst poklé; moljér]) (1622 – 1673) – franda dramverkisto kaj aktoro.................................................................612

**Molinari, Gustave** [molinári, gistáv] (1819 – 1911) – Belga ekonomikisto kaj ĵurnalisto, iris en 1843 al Parizo, kie li elmontris sian teorion de politika ekonomio bazitan ĉefe sur kreado de multaj ekonomiaj transportsistemoj, laborborsojn kaj aliajn rimedojn por apogi la disvolviĝon de la leĝo de postulo kaj propono. Liaj ideoj estis liatempe rifuzitaj de la marksistaj socialistoj..........................................394, 557

**Mommsen, Theodor** [mómzen, téodor] (1817 – 1903) –Germana historiisto, esploristo de la klasika antikveco...................................................................160, 163

Montalembert, grafo..........................................................................................439

**Monteil, Amans Alexis** [montéj, amá, aleksí] (1769 – 1850) – Franca historiisto, defendis la ideojn de la Franca Revolucio..........................................................700p.

**Montesquieu, Charles Louis** [monteskjé, ŝárl luí] (1689 – 1775) – Franca verkisto, unu el la teoriaj antaŭuloj de la eŭropa liberalismo, defendis la t.n. „kvantan teorion” de la mono.......................................................................................91, 120, 711

**Moore, Samuel** [múr, sémjŭl] – Angla juristo, amiko de Markso kaj Engelso; tradukis la 1-an volumon de la *Kapitalo* al la angla......................................................32, 755

**Moro, Tomaso** (Thomas Moore [tómes múr] (1478 – 1535) – Angla ŝtatisto kaj verkisto, aŭtoro de la fama libro „Utopia” [Utopio], en kiu li priskribas liberan, demokratian kaj socialisman socion sur la idealisma bazo de sia imago. Li estis kanceliero de Henriko la 8-a, la fama *blubarbulo*, kiu senkapigis lin.…32, 576, 676p., 692p.

Morris..............................................................................................................241

**Morton, John Chalmers** [mórten, ĝón ŝámes] (1821 – 1888) – Angla agronomiis ..........................................................................................................350, 515

**Moseo** (13-a jarcento a.n.e.) Gvidanto kaj leĝdonanto de la hebreoj, kiujn li aligis al la kulto de la dio Jahveo kaj al la „dek ordonoj”, kiujn respektas ankaŭ postaj religioj,

ekz-e la kristanismo.....349

Mougin.....334, 391

**Müller, Adam** [mjúler, ádam] (1779 – 1829) – Germana politikisto kaj ekonomikisto. Ekonomika romantikisto, „kies akreco konsistas en tio, ke li vidas la polvonubojn super la grundo kaj ke li prezentas tiujn polvonubojn kiel ion gravegan kaj misteran”. (Markso).....121,

**Müller, Anton** [mjúler, ánton] (16-a jarcento en Dancigo).....399

**Murphy, John Nicolas** [mérfi, ĝón níkles] – Angla verkisto.....663

**Murray, Hugh** [máre, júg] (1779 – 1846) – Angla geografiisto.....318

**Nasmyth, James** [nésmis, ĝéjmz] (1808 – 1890) – Angla inĝeniero, inventis la vapormartelon.....358, 386, 407

Naylor.....242p.

**Newman, Samuel B.** [njúmen, sémjŭel bí] (1796 – 1842) – Usona ekonomikisto kaj profesoro pri retoriko.....153, 195, 681, 686

**Newmarch, William** [njúmarĉ, ŭíljem] (1820 – 1882)-- Angla bankdirektoro kaj konata ekonomikisto, statistikisto; verkis ampleksajn aldonojn al la „Historio de la prezoj” de Tooke. Partiano de Rikardo kaj ortodoksa liberkomercisto.....276

**Newnham, G. B.** [njúnhem] – Angla advokato.....561

**Niebuhr, Berthold Georg** [níbur, bértolt géorg] (1776 – 1831) – Germana historiisto kaj burĝa politikisto. Aŭtoro de historio de la origino de la Roma Imperio, bazita sur rektaj fontoj.....219

**North, Sir Dudley** [nórs, sér dúdli] (1641 – 1691) – Angla ekonomikisto, posteulo de William Petty. Li estis unu el la plej gravaj komercistoj de sia tempo, kaj lia teorio respegulas la interesojn de la industria kaj komerca kapitalo kontraŭ la nemoveblaĵa proporieto. Unu el la unuaj kiuj postulis liberkomercon.....129, 363, 576

**Olmsted, Frederick Law** [ólmsted, frédrik ló] (1822 – 1903) – Nordamerika praktika kampkulturisto; vojaĝis al Anglio kaj tra Usono kaj priskribis en siaj verkoj la staton de la kampkulturo en tiuj landoj.....186

**Opdyke, George** [ópdajk, ĝóĝ] (1805 – 1880) – Usona ekonomikisto kaj bankisto en Novjorko; urbestro de tiu urbo.....157

Ord.....644

**Orkney, Elizabeth Villier, Lady** [órkni, elízebes viljé, lédi] (1657 – 1733) – Amatino de la reĝo Vilhelmo de Oranio.....680

**Ortes, Giammaria** [órtes, ĝamaría] (1713 – 1799) – Venecia monaĥo, unu el la plej gravaj italaj ekonomikistoj, kontraŭis la merkantilistojn; li estis antaŭulo de la klasika ekonomiko.....576, 605

Ottley.....231

Otway.....259

**Oveno, Roberto** [Owen, Robert (Óŭven, róbet)] (1771 – 1858) – Angla utopia socialisto. Profesie fabrikisto. La praktikaj spertoj kolektitaj en liaj fabrikoj kondukis lin al la komunista teorio. Li rifuzis ĉian perforton. Por skizi sian planon de la estonteco, li uzis la realajn konojn akiritajn en sia industria praktiko. Kiam li engaĝiĝis por la komunismo, la oficiala socio disiĝis de li..79, 94, 280, 375, 452, 470

**Overstone, Samuel Jones** [óveston, sémjŭel ĝóŭnz] (1796 – 1883) – Angla

bankisto, reprezentanto de la „currency principle” (kurzo-principo), patro de la bankleĝo de 1844, kiu baziĝis sur tiu kriterio................................................120, 139

**Pagnini, Gian Francisco** [panjíni, ĝán franĉísco] (1715 – 1789) – Itala ekonomikisto; aŭtoro de diversaj verkoj pri la moviĝo de preczoj............................92

**Palmerston, Lord (Henry John Temple)** [pámersten, lód (hénri ĝón témpl)] (1784 – 1865) – Angla ŝtatisto. Ĉefministro dum la Krimeo-milito, defendis reakcian eksteran politikon; favoris la carismon; Markso senmaskigis lin. „La subpremantoj povas ĉiam esti certa pri lia [palmerstona] subteno; inverse por la subprematoj li disponis ĉiam pri granda elverŝo de oratora larĝanimeco.”. (Markso)..................427

Papillon.........................................................................................................91

Parisot.........................................................................................................527

**Parry, Charles Henry** [péri, ĉálz hénri] (1779 – 1807) Angla kuracisto kaj verkisto, aŭtoro de libro pri la influo de la tritik-doganaĵoj sur la diversaj klasoj de la kampara loĝantaro.........................................................................................95, 561p.

Paŭlo (Sankta)..............................................................................................576

Pecqueur...........................................................................................573, 716

**Peel, Sir Robert** [píl, sé róbet], filo (1788 – 1850) – Angla ŝtatisto, fidela al la interesoj de la grandaj industrioj; al li ŝuldiĝas la nuligo de la kontraŭgrenaj leĝoj (doganaĵoj pri greno)...............................................................21, 137, 216, 713, 726

**Peel patro** de Sir Robert (supre menciita) – Angla fabrikisto................................720

**Periklo.** (ĉirkaŭ 490 – 429 a.n.e.) – Gvidanto de la atena demokratio en la epoko de ĝia plej alta ekonomia kaj kultura florado. Li nuligis la plej gravajn privilegiojn de la aristrokrataro kaj anstataŭigis ilin per hierarĥio de pura riĉeco de la dominanta klaso.........................................................................................................342

**Perseo** – Heroa figuro de la greka mitaro.................................................................17

Peto.............................................................................................................218

**Petty, William** [péti, ŭíljem] (1632 – 1687) – Angla statistikisto kaj ekonomikisto; unu el la antaŭuloj de la „klasika” ekonomiko ......50, 56, 83, 92, 100, 119, 137, 140, 163, 253p., 294, 325, 341, 400, 516, 576p.

**Pindaro** (522 – 443 a.n.e.) – Greka lirikisto.................................................145, 391

**Pinto, Isaac** [ísaak pínto] (1715 – 1787) – Riĉa nederlanda judo, konsilisto kaj financisto de la nederlanda ŝtato; aŭtoro de serio da ekonomikaj verkoj...............145

**Pitt, William** [pít, ŭíljem] (1759 – 1806) – Ĉefministro de Britio de 1783 ĝis 1801, restarigis la financojn de la ŝtato, kiuj troviĝis en malbona stato pro la milito de nordamerika sendependeco. Ekstere li gvidis la longan batalon kontraŭ la revolucia Francio ekde 1793. Kontraŭ la irlanda naciismo li sukcesis politike integri la insulon en la britan reĝlandon (Akto de la Unio, 1800). Denove ĉefministro (de 1804 ĝis 1806), li reorganizis la britan militŝiparon, kiu venkis Napoleonon ĉe *Trafalgar* en 1805. [Encikl. Larousse, hisp.]......................................................................194, 697

**Platono** (ĉirkaŭ 428 – 348 a.n.e.) – Greka filozofo ideologiistode la sklavista klaso. Fondinto de la objektiva idealismo. Laŭ lia teorio, la aferoj ekzistas eterne kaj senvarie ekster tempo kaj spaco. En siaj dialogoj aperas elementoj de idealisma dialektiko. Politike li estis malamiko de la demokratio. En sia libro pri la ŝtato („Pri la respubliko”) li skizas la reakcian utopion de konsum-komunismo por la reganta aristokrata klaso de la „gardantoj” (do, de la filozofoj, regantoj kaj soldatoj), al kiu la

Indekso de personaj nomoj

metiistoj kaj kamplaboristoj devas submetiĝi. En lia utopio ne ekzistas komerco kaj interŝanĝo..........341p.

Plutono..........128

**Postlethwayt, Malachy** [postlésŭejt, méleĉi] (ĉirkaŭ 1707 – 1767) – Angla ekonomikisto. Li eldonis grandan vortaron pri komerco kaj aŭtoris multnombrajn verkojn pri la brita komerca politiko..........255p.

**Potter, Edmond** [póte, édmond], Angla fabrikisto..........276, 534, 536

**Price, Richard** [prájs, ríĉet] (1723 – 1791) Angla liberala teologo, pledis por la movado de nordamerika sendependeco; amiko de Franklin; aŭtoro de verkoj pri publika mastrumado..........255, 631p., 683p.

**Prometeo** En la greka mitaro, persono el la raso de la titanoj, iniciatinto de la unua homa civilizacio. Li ŝtelis la sanktan fajron al la dioj kaj transdonis ĝin al la homoj. Zeŭso, por puni lin, katenis lin ĉe montsupro de Kaŭkazo, kie aglo voradis lian hepaton, kiu tamen senĉese rekreskadis. Heraklo liberigis lin. [Encikl. Larousse, hisp.]..........604

**Prudono** (Pierre Joseph Proudhon [pjér ĵozéf prudón] (1809 – 1865) Etburĝa franca socialisto; unu el la teoriaj fondintoj de anarĥiismo. Prudono „nebuligas la ekonomiajn kategoriojn, transformante ilin en eternajn ideojn, por denove alveni, post tiu ĉirkaŭvojo, al la burĝa ekonomio". „Kiel li neniam sciis, kio estas la vera scienca dialektiko, li ĉiam restis nur sofisto". (Markso). La teorioj de Prudono, refutitaj de Markso en sia verko „Mizero de la filozofio" (1847), havis grandan influon en Francio dum longa tempo, kaj la anarĥiistoj daŭre aliĝas al ili. – [Vidu Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero". Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin; Pri J. P. Prudono, Letero al J. B. von Schweitzer, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009,. -vl] .....72, 83, 86, 334, 391, 393, 500, 547

**Pusey, Philip** [púsi, fílip] (1799 – 1855) – Angla agronomiisto kaj liberala diputito..........636

**Quesnay, François** [kené, frasŭá] (1694 – 1794) – Franca kuracisto kaj ekonomikisto, ĉefa figuro de la fiziokrata skolo..........21, 106, 300, 516, 576

**Quételet, Lambert A.** [ketelé, lambér] (1796 – 1874) – Belga matematikisto, fundinto de la moderna sociallstatistiko..........303

Quincey, Th. de..........368

**Raffles, Sir Thomas Stamford** [réflz, sér tómes stémfot] (1781 – 1826) – Angla kolonia oficisto, guberniestrodeJavo. ..........335

**Ramazzini, Giorgio** [ramacíni, ĝórĝo] (1633 – 1714) – Itala kuracisto, kiu esploris precipe la malsanojn de laboristoj..........339

**Ramsay, Sir George** [rémsi, sér ĝóĝ] (1800 – 1871) – Angla filozofo kaj ekonomikisto. Laŭ lia pozicio, la kapitalisma produktadmaniero, kaj do la kapitalo, estas neniel absoluta kondiĉo, sed simpla hazarda historia produktadkondiĉo. Tamen, li ne progresigas sian analizon sufiĉe por veni al la konsekvencoj. (Markso)..155, 158, 297, 477, 527, 591

**Ravenstone, Piercy** [révenston, pírsi] (ĉirkaŭ 1825) – Angla ekonomikisto; agnoskis la historiecon de la kapitalo kaj demonstris, ke kun la fortigo de la laborproduktivo la kapitalo kreskas, do, la riĉaĵo de la aliaj..........401, 477

Read..........234

Redgrave.......................................351, 369, 374, 388, 404, 419, 427p., 509, 521pp.

**Regnault, Elias** [renjó, eliás] (1801 – 1868) – Franca verkisto kaj historiisto; financministro post la revolucio de 1848..........................................................................222

**Reich, Eduard** [éduart rájĥ] (1836 – 1915) – Germana kuracisto kaj populara verkisto pri naturscienc aj temoj..........................................................................340

ReVo.........................................................................................................407

**Rikardo** [Ricardo, David (rikárdo, dévid) – 1772 – 1823] – Angla ekonomikisto, la lasta granda reprezentanto de la klasika ekonomiko.….20p., 23, 67, 79, 82, 85, 120, 139, 155, 159, 178, 192, 194, 213p., 287, 361, 365p., 379, 401p., 409, 473, 481, 485pp., 492, 495, 498, 524, 533, 549, 556, 559, 566p., 574, 591, 713

**Richardson, Sir Benjamin Ward** [ríĉetsen, sé bénĝemin ŭót] (1828 – 1896) – Angla higienisto..........................................................................237, 239

Roberts.........................................................................................................678

**Robinson** (tradukinto de „Utopia” de Moro..................................................679

**Robinsono**, (ĉefrolulo de la romano de Daniel Defoe)................................79p., 270

**Rodbertus-Jagetzow, Karl** [rodbértus jagéco, kárl] (1805 – 1875) – Germana profesoro pri ekonomiko. En sia teorio de grundrento respeguliĝas lia propra socia situacio kiel grundproprietulo. Rodbertus supozas la diferencon inter la plusvaloro kaj ĝiaj specialaj formoj … sed ne renkontas ĝin, ĉar tio, kio interesas lin ekde la unua momento, estas klarigi determinitan fenomenon, nome la grundrenton, kaj ne malkovri la ĝeneralan leĝon”. (Markso) En la teorio de la nacia rento „Rodbertus en la substanco ripetas la doktrinon de Adam Smith, sen ekskludi ties fundamentan eraron, kiu konsistis en lia disfendo de la valoro en salajron kaj plusvaloron.” (Lenino)..........................................................................495

**Rogers, James** [róĝes, ĝéjmz] (1823 – 1890) – Angla liberala ekonomikisto; unu el la precipaj reprezentantoj de la t.n. historia skolo; teoriulo de la liberkomerca parti ..........................................................................631, 637, 680, 705

Rogier.........................................................................................................258

**Roscher, Wilhelm** [róŝer, vílhelm] (1817 – 1894) – Germana vulgar-ekonomikisto, profesoro pri ekonomiko.................................93, 153, 194, 203, 213, 245, 303, 573

**Rossi, Pellegrini Luigi** [rósi, pelegríni luíĝi] (1787 – 1848) – Itala vulgar-ekonomikisto kaj politikisto. „Plena de pedanteco kaj fanfarona ĉarlataneco”. (Markso).….165, 532

**Roux-Lavergne, Pierre** [rú-lavérnj, pjér] (1802 – 1874) – Franca historiisto kaj politikisto, partiano de la „novkatolikismo” de Buchez..........................................698

Roy..........................................................................................27, 32, 134, 612

**Rubenso (Rubens, Pieter Paul** [rúbens, píter páŭl] (1577 – 1640) – Fama nederlanda pentristo..........................................................................278

**Ruge, Arnold** [rúge, árnolt] (1802 – 1880) – Germana novhegelana publicisto, persekutata kaj malliberigiita pro demagogio. Li eldonis, kune kun Markso, la „Germanaj-francaj jarlibroj” (Deutsch-Französische Jahrbücher), el kiuj aperis nur unu duobla numero (1844). Tiu etburĝa revoluciulo aliĝis fine la vicojn de la partianoj de Bismarko..........................................................................146

**Rumford** [rámfot], duko de (**Sir Benjamin Thompson** [sé bénĵemin tómsen] (1753

– 1814) – Angla verkisto. Post la angla-amerika milito li ekservis ĉe la bavara ŝtato kiel ministro pri milito. Li estas la fondinto de domoj de bonfarado....................560p.

Rusoo....................................................................................................................702

**Russell, Lord John** [rásl, lód ĝón] (1792 – 1878) – Angla liberala ŝtatisto...548, 683

Ryder....................................................................................................................362

**Sadler, Michael, Thomas** [sédle, májkl, tómes] (1780 – 1835) – Angla socialreformisto, membro de la malsupra ĉambro de la parlamento, kontraŭ Malthus kaj la liberkomerco.........................................................................633, 662

Saltoun..................................................................................................................679

Sanderson............................................................................................244p.

Saunders...........................................................................271, 282, 375

**Say, Jean Baptiste** [sé, ĵá batíst] (1767 – 1832) – Franca vulgar-ekonomikisto, granda defendisto de la interesoj de la burĝaro kontraŭ la proletaro......82, 111, 148, 156, 182, 193, 361, 411, 486, 500, 554, 566p.

**Schorlemmer, Karl** [ŝórlemer, kárl] (1834 – 1892) – Germana ĥemiisto, amiko de Markso kaj Engelso en Londono; siatempe li estis unu el la ĉefaj mondaj aŭtoritatoj pri ĥemio....................................................................................................289

Schow....................................................................................................................480

**Schulz, Wilhelm** [ŝúlc, vílhelm] (1797 – 1860) – Germana publicisto, radikalldemokrata; persekutata de la reakciularo, laboris kiel profesoro en Zuriko...... ...........................................................................................................................346

**Schulz, Wilhelm** [ŝúlc, vílhelm] (1797 – 1860) – Germana publicisto radikaldemokrata, persekutata de la reakcio, fariĝis profesoro en Zuriko.................................213

**Schulze-Delitzsch, H.** [ŝúlce-déliĉ] (1808 – 1883) – Germana politikisto kaj kooperativisto, kontraŭ kies ideoj Lasalo polemikis en verko publiikigita en 1864...15

Schweitzer, J. B. ...........................................................................................391

**Scrope, George P.** [skróŭp, ĝóĝ pí] (1797 – 1876) – Angla geologo kaj ekonomikisto, liberkomercisto kaj defendanto de la fabrikleĝoj............................................556

Seeley....................................................................................................................684

**Seksto Empiriko** (Sexto Empirico [séksto empíriko]) (2-a ĝis 3-a jarcento d.n.e.) – Greka filozofo, astronomo kaj kuracisto, disvolvis praktikan skeptikismon en scienco; en mediciono li rekomendis la observadon de patologiaj fenomenoj por elekti la taŭgajn rimedojn.........................................................................342

**Senior, William Nassau** [sínie, ŭíljem náso] (1790 – 1864) – Angla ekonomikisto, „simpla apologiisto de la ekzistanto kaj en tio vulgar-ekonomikisto; porparolanto de la famaj burĝoj”. (Markso) .......................................................................................209p., 212, 245, 301, 377p., 409, 451p., 460, 506, 510, 556, 670, 688

**Shaftesbury,** Anthony Ashley Cooper [énteni éŝli kúpe], grafo de Shaftesbury [ŝéjfcberi]) (1621 – 1683) – Angla ŝtatisto, ĉefo de la opozicio de la *whig*, devis fuĝi al Nederlando.......................................................................................384, 633p.

**Shylock** [ŝájlok] – Persono el la dramo de Ŝekspiro „La komercisto de Venecio”, prototipo de la uzuristo obstina pri laŭvorta interpreto de leĝo por defendi siajn proprajn interesojn, eĉ se lia ŝuldanto ĉe tio pereas.....................................269, 645

**Sidmouth, Henry Addington** [sídmaŭd, hénri édingtn] (1757 – 1844) – Angla

reakcia ŝtatisto....................................................................................................400

**Sieber, H.** [zíber] (1844 – 1888) – Rusa ekonomikisto...........................................23

Sikes...................................................................................................................413

**Simon, Sir John** [sájmen, sé ĝón] (1816 – 1904) – Konata angla kuracisto. Kiel membro de la Sekreta Ŝtat-Konsilantaro li realigis serion da esploradoj pri la sanstato kaj la situacio de la angla laborista loĝantaro......371, 435, 614, 616p., 623, 625, 640

Simpson...............................................................................................................459

**Sismondi, Jean Charles Léonard** [sismondí, ĵá ŝarl léonár] (1773 – 1842) – Svisa ekonomikisto kaj historiisto. Li kritikis la klasikan ekonomikon el la vidpunkto de la ekonomia romantikismo. „Li konsciiĝas, speciale pri la fundamenta kontraŭdiro inter la limigita evoluo de la produktadfortoj kaj la kresko de la riĉaĵo samtempe estigata en formo de varoj kaj kiu do, kiel varoj, estas transformenda en monon, kaj aliflanke, kiel bazo, la limigo de la nepraj vivrimedoj por la amaso de produktistoj" (Markso). „Li entute distingiĝas disde la klasikuloj en tio, ke li montras la kontraŭdirojn de la kapitalismo. Tio estas unu el la flankoj; aliflanke li ne sukcesas, kaj des malpli antaŭenigas (kion li eĉ ne intencas) la analizon de la klasikuloj, kaj en tio limigas sin al sentimentala kritiko de la kapitalismo el la vidpunkto de etburĝo." (Lenino) ...............20, 149, 165, 219, 295, 499, 537, 541, 545p., 554, 593, 606, 717

**Sizifo** – Greka mita figuro, kondamnita eterne ruli al monta supro rokon, kiu, kiam ĝi apenaŭ troviĝas supre, tuj ruliĝas malsupren, kaj la „sizifa" laboro rekomenciĝas, poreterne. „Sizifa laboro" estas sinomimo de laboro malfacila kaj sterila..............395

**Skarbek** [skárbek], Frederiko (1828 – 1866) – Pola ekonomikisto...............306, 328

**Smith, Adam** [smís, édem] (1723 – 1790) – Angla ekonomikisto kaj filozofo. Li estas la aŭtoro, kiu donas al la klasika ekonomiko ĝian definitivan formon. Markso nomas lin la ekonomikisto de la manufaktur-periodo. Liaj teorioj pri la labordivido, pri produktiva laboro kaj pri la plusvaloro fariĝis tre gravaj. Laŭ lia teorio, la vera riĉaĵo de la nacioj ne estas la mono, kion asertis la merkantilistoj, sed la utila laboro, kreanto de interŝanĝvaloroj. Por li, ne nur la kampkultura laboro, kion asertis la fiziokratoj, sed ankaŭ la industria laboro kreas plusvaloron. „La kontraŭdiroj de A. Smith", diras Markso, „estas ege interesaj, ĉar ili entenas problemojn, kiujn li, kvankam li ne solvas ilin, tamen montras per tio ke li kontraŭdiras sin." 23, 52p., 82, 119p., 159, 326, 331, 338, 339, 382, 341, 361, 430, 473, 486, 497, 500, 503, 516, 520p., 529, 549p., 554, 570, 574p., 577p., 581, 602, 613, 671, 686, 695, 715

Smith, afergvidanto.........................................................................................230p.

**Smith, Edward** [smís, édved] (1818 – 1874) – Angla kuracisto kaj verkisto pri temoj de medicino; li konsilis la registaron pri la leĝdonado pri bonfarado…367, 613p, 639

Smith, Goldwin....................................................................................................705

Smith, J................................................................................................................638

Smith, William......................................................................................................241

Snell.....................................................................................................................452

Snigge..................................................................................................................679

**Soetbeer, Adolf** [sótbir, ádolf] (1814 – 1892) – Germana ekonomikisto kaj statistikisto, specialisto pri esplorado de valutaj problemoj.....................................30

**Sofoklo** (195 – 106 a.n.e.) – Fama greka dramisto, aŭtoro de diversj famaj tragedioj, ekz-e de *Antigono*.....................................................................128

Somers...688pp.

**Sorge, F. A.** [zórge] (1828 – 1906) – Germana komunisto. Li aktive partoprenis en la ribelo de Badeno en 1849. Li elmigris al Usono, kie li ludis gravan rolon en la germana kaj usona laborista movado. Li intense korespondadis kun Markso kaj Engelso kaj defendis en la usonaj sekcioj la linion de la Ĝenerala Konsilantaro de Londono. Ĝenerala sekretario de la Internacio (ĝis 1874) ...33

**Spinozo**, (Benedikt Spinoza [benedíkt spinóza]) (1632 – 1677) – Juddevena nederlanda filozofo – Edukita por fariĝi rabeno, li iniciĝis en ĉiuj branĉoj de la scio, en kontakto kun la pensaj majstroj de sia tempo (Leibnitz [lájpnic]). Dum sia vivo li publikigis nur *Principoj de la filozofio de Kartezio* (1663), kiu kaŭzis al li la malamikecon de la religiaj instancoj. La pensado de Spinozo montriĝas kiel mesaĝo samtempe liberiga el ĉiaj servutoj kaj portanta la plezuron kiun estigas la scio […] [Encikl. Larousse, hisp.]...25, 556

**Stafford, William** [stéfod, ŭíljem] (1554 – 1612) – Angla historiisto, kortegano...700

**Stamfort Raffles, Th.** (vd sub *Raffles*)...335, 707

Stapleton...560

**Steuart, James** [stjúet, ĝéjmz] (1712 – 1780) – Angla ekonomikisto.....36, 119, 139, 143, 170, 311, 329, 400, 516, 606, 675, 686, 702

Stevens...624p.

**Stewart, James** [stjúet, ĝéjmz] (1712 – 1780) – Angla ekonomikisto...454

Stewart...301, 322, 337, 575

**Stolberg, Christian Graf zu** [stólberk, krístjan grá cú] (1748 – 1821) – Germana lirikisto...380

**Storch, Heinrich** [stórĥ, hájnriĥ] (1766 – 1835) – Rusa ekonomikisto, kontraŭdiranto al A. Smith...166, 173, 328, 336p., 550, 606

Strahan...577

Strange...240

Strype...693

Sturrock...403

**Sully, Maximilien de Béthune** [silí, maksimiljén de betín] (1560 – 1641) – Franca ŝtatisto kaj ekonomikisto...576

**Sutherland, grafino de** [sátelent] (1806 – 1868) – Unu el la plej grandaj aristokrataj grundproprietuloj de Anglio...687

**Ŝekspiro, Vilhelmo** (1564 – 1616) – La plej mondfama angla verkisto (dramoj, poezio)...106, 128, 455, 680, 700

Tait...443

**Tamerlano**, vd *Timuro*...245

**Taylor, Sedley** [téjle, sédli] – Angla verkisto pri kooperativaj temoj...39p.

Taylor, Edward...241

**Temple, Sir William Bart** [témpl, sér ŭíljem bárt] (1628 – 1699) – Angla ŝtatisto kaj verkisto...576

**Thiers, Adolphe** [tjér, adólf] (1797 – 1877) – Franca politikisto, ĵurnalisto kaj historiisto. Li defendis la parlamentan monarĥio kaj estis plurfoje ministro kaj ĉefministro

inter 1830 kaj 1848. Inter 1848 kaj 1851 li estis la ĉefa reprezentanto de la konservativuloj. Li estis ĉefo de la plenuma potenco en februaro 1871. Li faris la packontrakton kun Prusio kaj kun ties helpo disbatigis la revolucion de la Pariza Komunumo en 1871.....413, 671

**Thompson, William** [tómpsn, ŭíljem] (ĉirkaŭ 1785 – 1833) – Angla ekonomikisto, partiano de Oveno, precipa scienca reprezentanto de la ovena komunismo.........338

Thoraine.....700

**Thornton, William Thomas** [tónten, ŭíljem tómes] (1817 – 1880) – Angla ekonomikisto, apoganto de John Stuart Mill.....163, 250, 676

**Thünen, Johann Heinrich von** [tínen, jóhan hájnriĥ von] (1783 – 1850) – Germana ekonomikisto kaj meklenburgia grundproprietulo. Aŭtoro de la verko „La izolita ŝtato”.....580

Tillie.....432, 443

**Timuro** (Timur Lang, ankaŭ nomata Tamerlan) (1336 – 1405) – Emiro Transoksiano (1370 – 1405), deklaris sin heredanto de Ĝingis Ĥan kaj starigis vastan kaj efemeran turkan imperion bazitan sur milita forto, teroro kaj jura-religia sistemo, kiu unuigis la mongolajn kaj islamajn leĝojn. Li igis la urbon Samarkando granda intelekta kaj arta centro.....245

**Tito** (40 – 81) – Roma imperiestro, kiu regis de 79 ĝis 81.....370

**Tooke, Thomas** [túk, tómes] (1774 – 1858) – Angla ekonomikisto, aŭtoro de la grava verko „Historio de la prezoj de 1792 ĝis 1856”. Markso diras pri li, ke li estis „la lasta angla ekonomikisto d*e ia valoro*.....276

**Torrens, Robert** [tórens, róbet] (1780 – 1864) – Angla militisto kaj ekonomikisto, liberkomercisto.....154, 163, 175, 377, 409

**Townsend, Joseph** [táŭnsnt, ĝóŭzef] (1739 – 1816) – Angla pastro, „laŭdas la malriĉecon kiel nepran kondiĉon de riĉeco”. (Markso).....575p., 605

**Tremenheere, Hugh Seymour** [trémenhir, jú séjme] (1804 – 1893) – Angla publicisto.....246

**Tucidido** (460 – 395 a.n.e.) – Atena historiisto, la plej grava inter la grekaj historiistoj.....342

**Tucker, Josiah** [táke, ĝósie] (1712 – 1799) – Angla ekonomikisto, antaŭulo de A. Smith. Li defendis la liberkomercon kaj pledis por la disigo de la amerikaj kolonioj disde la metropolo.....576, 715

Tuckett, J. D.....338, 678, 705

Tufnell.....246

**Tupper, Martin** [tápe, mátin] (1810 – 1889) – Angla verkisto kaj poeto, modelo de vulgareco.....569

**Turgot, Anne Robert Jacques, barono de Laulne** [tirgó, án robér ĵák] (1727 – 1781) – Franca ŝtatisto kaj ekonomikisto, fiziokrato kaj la plej fama disĉiplo de tiu skolo.....171, 294, 497

Turner.....241, 402

**Ure, Andrew** [júr, éndru] (1778 – 1857) – Angla kritikisto kaj sociologo 36, 212, 245, 254, 280, 301, 326pp., 344, 354, 359, 376, 391p., 395, 403p., 408p., 514, 518, 521

Urquhart, David .....99, 340, 472, 688, 704p.

Indekso de personaj nomoj

**Vanderlint, Jack** [véndelint, ĝék] (mortis en 1740) – Angla ekonomikisto. . 119, 126, 140, 257, 294, 310, 325, 576

**Vauban, Sébastien** [vobán, sebastjén] (1633 – 1707) – Fama franca militista inĝeniero.....135

**Vaucanson, Jacques** [vokansón, ĵák] (1709 – 1782) – Franca meĥanikisto, inventis teksmaŝinon kaj tre famajn aŭtomatojn. .....355

**Verri, Pietro** [vérri, pjétro] (1728 – 1797) – Itala ekonomikisto.....49p., 90, 129

Vickers.....242p.

**Vilhelmo la 3-a de Oranio** (1650 – 1702) – Reĝo de Anglio de 1689 ĝis 1702, post kiam li eltronigis sian bopatron, Jakobo la 2-a.....680

**Vilhelmo la 4-a** (1765 – 1837) – Reĝo de Grand-Britio, Irlando kaj Hanovro (1830 – 1837), filo de Georgo la 3-a.....269

**Vissering, Simon** [vísering, símon] (1818 – 1888) – Nederlanda ekonomikisto de la skolo de Bastiat.....470

**Voltero** (François Marie Arouet [frasŭá marí arué] nomata Voltaire [voltér] (1694 – 1778) – Franca verkisto, kiu esprimis siajn liberalajn, raciismajn kaj kontraŭklerikajn ideojn en poemoj, rakontoj kaj historiaj skizoj.....184

**Wade, John** [ŭéjd, ĝón] (1718 – 1775) – Angla ĵurnalisto.....18, 253, 578

**Wakefield, Edward Gibbon** [ŭéjkfild, édŭed ĝíben] (1796 – 1862) – Angla ekonomikisto kaj kolonia politikisto.....250, 305, 542, 633, 719pp., 723pp.

Walden.....258

Walkley.....237

**Wallace, Robert** [ŭólis, róbet] (1697 – 1771) Angla pastro, aŭtoro de pluraj libroj pri la problemo de loĝantaro.....575

Ward.....249

**Watson, John Fordes** [ŭósn, ĝón fórds] (1827 – 1892) – Skota kuracisto, aŭtoro de diversaj verkoj pri Hindio. .....365

**Watt, James** [ŭót, ĝémz] (1736 – 1819) – Brita esploristo kiu faris esencajn plibonigojn al la vapormaŝino inventita de T. Newcomen kaj tiel ebligis ĝian industrian aplikadon.....349, 351, 352, 355, 358, 361, 456

**Watts, John** [ŭóc, ĝón] (1818 – 1887) – Angla socialisto, partiano de Roberto Oveno (Robert Owen).....512, 515

**Wayland, Francis** [ŭejlent, fréncis] (1796 – 1865) – Usona universitata profesoro, aŭtoro de manlibro pri ekonomio.....156, 195

Wedgwood.....248

**Wellington** [ŭélingtn], duko de (1769 – 1852) – Fama angla generalo, pri kiu Engelso diris, ke „ĉiuj liaj agoj estis modelaj, sed neniu estis majstra”.....120

**West, Sir Edward** [ŭést, sér édŭod] (1782 – 1828) – Angla ekonomikisto, unu el la unuaj teoriuloj pri la grundrento.....492, 505p.

Whitbread.....697

White.....230, 240, 245p., 374, 439p., 450

**Whitney, Eli** [ŭítni, éli] (1765 – 1825) – Usona inventinto de la maŝino por sensemigi kotonon.....357, 364

**Wilks, Mark** [ŭílks, márk] (ĉirkaŭ 1760 – 1831) – Angla oficiro kaj diplomato, okupis altajn militistajn postenojn en Hindio........................................................................335

**Wilson, James** [ŭílzn, ĝßejmz] (1805 – 1860) – Angla ekonomikisto, liberkomercisto, fundinto de la revuo *Economist*....................................................318

Wirt......................................................................................................................213

**Wirth, Max** [írt, máks] (1822 – 1900) – Germana vulgar-ekomikisto, modera defendanto de la dogansistemo...................................................................................79

**Witt, Johann de** [vít, johán de] (1625 – 1672) – Nederlanda ŝtatisto, gvidanto de la nederlanda burĝaro..........................................................................576, 711

Wolf, Christian......................................................................................................569

Wollaston..............................................................................................................452

Wood.....................................................................................................................228

**Wright, Thomas** [rájt, tómes] (1711 – 1786) – Angla naturesploristo...................682

**Yarranton, Andrew** [jérentn, éndru] (1616 – ĉirkaŭ 1648) – Angla teĥnikisto kaj astronomo de la manufaktura periodo....................................................................325

**Young, Polonius Arthur** [jáng, árte] (1741 – 1820) – Angla verkisto kaj ŝtatisto ..............................................................................................119, 214, 255, 631, 639

# Listo de mallongigoj kaj simboloj uzataj en la libro

ĉa = ĉirkaŭ = proksimume

divl. = diversloke

ekz-e = ekzemple

ekz-ero = ekzemplero

ekz-o= ekzemplo

K-io = Kompanio

ktp = kaj tiel plu

l.c. = loko citita

n-ro = numero

p. = paĝo(j)

s. = sekva

s-j = sekvaj

saml. = samloke

sl. = samloke

s.l. = sen indiko de (aper)loko

s.l.k.d. = sen indiko de loko kaj dato

v.c. = verko citita

vd = vidu

vol. = volumo(n)

-vl = signo, fine de piednoto, montranta la aŭtorecon de la tradukinto al Esperanto

< … > = la enhavo de angulaj krampoj estas aldonaĵo de la eldoninto de la (germanlingva) originala eldono de la verkoj de Markso (MEW), el kiuj tiu ĉi libro estas la volumo n-ro 23.

# Postparolo de la tradukinto

Kiel anoncite en la lasta libro de la partaj eldonoj de tiu ĉi verko, – komence de tiu ĉi jaro esprimite kiel espero –, en tiu ĉi libro kuniĝis la unue disaj en tri volumoj aperintaj partoj de la „Unua libro” de la *Kapitalo.*

Temas pri reviziita kaj korektita eldono de la antaŭaj tri libroj, kun nomindekso por la tuta teksto.

Tiu ĉi estas la „unua volumo” de la *Kapitalo*, kiu konsistas el entute tri volumoj (kaj eĉ kvar, se oni inkludas ankaŭ la libron „Teorioj pri la plus-valoro”).

Estas tasko de la tradukisto trovi la taŭgajn vortojn por kelkfoje malfacile tradukeblaj terminoj de la aŭtoro, kiuj krome kongruu ankaŭ kun tiuj de aliaj verkoj de kaj pri Markso. Jam la Esperantaj tradukintoj de la „Manifesto de la Komunista Partio” (de Arthur Baker – el la angla traduko, en 1908 –, de Emil Pfeffer, el la germana originalo, – 1923 – kaj de Detlev Blanke[1], el la germana originalo, 1989)[2] prezentas diferencojn en la elekto de multaj terminoj. El tiuj tradukoj, tiu de Blanke estas tiu kiu ne nur bone redonas la sencon de la originalo, sed ĝi estas ankaŭ sur la nivelo de la nuntempa lingvouzo. Miaj lingvaj solvoj kongruas plejparte kun tiuj de Blanke, sed en la *Kapitalo* troviĝas multaj kromaj okazoj en kiuj necesas decidi pri taŭga ekvivalento, simple pro ĝia amplekso. Krome, necesis kiom eble plej konformiĝi kun la terminoj uzitaj en aliaj antaŭe eldonitaj verkoj de Markso, tasko tamen pli facila, ĉar tiuj tradukoj estis faritaj de la tradukinto de tiu ĉi libro.[3]

---

1 Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo, komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 289 p. ISBN 978-2-918300-45-8 (korektita eldono) – La ne korektita traduko de Blanke troviĝas en jena eldono: Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la komunista partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5. Tiu ĉi sama teksto troviĝis – ĝis meze de 2009 – en la reto en formo de „eLibro”, libere elŝutebla ĉe http://www.omnibus.se/inko/, enpaĝigita de Franko Luin en 2002, ISBN 91-7303-142-9 kaj estas nun libere elŝutebla el la retejo <http://www.marxists.

org>

2 Intertempe aldoniĝas kroma traduko: (librofina librolisto n-ro 100) (2015-04-06) -vl

3 Temas pri jenaj verkoj de Karlo Markso kaj Frederiko Engelso, laŭ la aper-vico (la ISBN-numeroj kaj pli detalaj informoj aperas en la librofina listo de libroj eldonitaj ĉe MAS. Por faciligi la eltrovon de koncerna titolo en tiu listo mi aldonas ĉi tie la respektivan numeron):

La motivo por aperigo de tiu ĉi unueca volumo de la Kapitalo estas (kompreneble krom ke ĝi servu por ke la Esperantistaro konatiĝu kun la fundamento de ekonomiko – do ankaŭ de la moderna kaj aktuala ekonomia scienco – en la internacia lingvo) la fakto, ke aktualaj marksismaj (kaj kelkfoje eĉ nemarksismaj) verkoj referencas tiun ĉi verkon de Markso, kaj ke oportunas trovi ĉiujn tiajn referencojn en unueca volumo, ĉu en papera formo, ĉu en cifereca formo libere elŝutebla el la reto, laŭeble en la ĝenerala retejo por marksismaj verkoj: www.marxists.org (krome en la retejo de MAS, libere alirebla por MAS-anoj).

---

– Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871, La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, Mondial, Novjorko, 2005, 137 paĝoj (ne aperas en la listo, ĉar ne eldonita ĉe MAS);

– Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito, Monda Asembleo Socia (MAS), 2007, 59 paĝoj (n-ro 3);

– Markso hodiaŭ, nerefuteblaj citaĵoj, Monda Asembleo Socia (MAS), 2008, 89 paĝoj (n-ro 7);

– Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 41 paĝoj (n-ro 11);

– Karlo Markso: Parolado pri la demando de liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 52 paĝoj n-ro12);

– Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 44 paĝoj (n-ro 13);

– Karlo Markso: La mizero de la filozofio, Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero”, Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin; Pri J. P. Prudono, *Letero al J. B. v. Schweitzer,* MAS, 2009, paĝoj (n-ro 17);

– Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, MAS, 2010, (n-ro 25);

– Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, MAS, 2010, 204 paĝoj (n-ro 26);

– Karlo Markso: Pri „La juda demando”, MAS, 2010, 49 paĝoj (38);

– Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo, MAS, 2010, 36 paĝoj (n-ro 44);

– Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio, MAS, 2011, 57 paĝoj (56);

Kaj verkoj de marksistoj post Markso kaj Engelso (de diversaj tradukistoj menciitaj nur en la librofina listo, laŭ la apervico):

– Fidel Castro Ruz: Dialogo de la civilizacioj, MAS, 2009, 84 paĝoj (n-ro 8);

– Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj … MAS, 2008, 142 paĝoj (n-ro 16);

Kvankam temas ĉi tie pri reviziita kaj korektita eldono, kompreneble nenio estas perfekta, kaj estus bone, ke por estontaj reeldonoj la legantoj indiku al la tradukinto siajn rimarkojn, proponojn por plibonigo ktp, prefere en la diskutlisto pri la *Kapitalo*:

kapitalrondo@yahoogroups.com

Por aliĝi al ĝi, sufiĉas sendi (malplenan) mesaĝon al
<kapitalrondo-subscribe@yahoogroups.com>.

Sed kompreneble vi povas ankaŭ sendi viajn rimarkojn simple al la

---

– Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, MAS, 2009, 57 paĝoj (18);

– Oktobra Revolucio kaj la sekvoj, MAS, 2009, 48 paĝoj (n-ro 21);

– Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 paĝoj (n-ro 22)

– La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj, eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 72 paĝoj (n-ro 23)

– Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”„ MAS, 2010, 49 paĝoj (n-ro 27)

– Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3, MAS, 2010, 80 paĝoj (n-ro 28)

– Werner Seppmann: Laboro kaj dialektiko …, MAS, 2010, 79 paĝoj (n-ro 29)

– Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, MAS, 2010, 199 paĝoj (n-ro 33)

– Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj … MAS, 2010, 75 paĝoj (n-ro36)

– Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio, MAS, 2010, 59 paĝoj (n-ro 37)

– Jozefo Ŝlejfŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino, MAS, 2010, 271 paĝoj (n-ro 41)

– Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES, MAS, 2010, 80 paĝoj (n-ro 43)

– Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco, MAS, 2010, 89 paĝoj, (n-ro 47)

– Roberto Ŝtejgervaldo: Komunistaj star- kaj disput-punktoj, MAS, 2010, 151 paĝoj (n-ro 48)

– Jürgen Albohn: Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la „Wertkritik”, MAS, 2010, 27 paĝoj (n-ro 49)

– V. I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio. MAS, 2011, 181 paĝoj (n-ro 50)

adreso de la tradukinto, kun la rimarko KAPITALO en la temlinio: vlutermano@gmail.com

Kompreneble la tradukado de la pliaj volumoj de la *Kapitalo* ne ĉesas – la dua volumo estas aktuale tradukata, la tria kaj „kvara” volumo atendas tradukonton.

Ĉi tie mi indiku nur kelkajn principojn, laŭ kiuj mi tradukis tiun ĉi verkon. Mi baziĝis ĝenerale sur la germanan originalon en ĝia lasta eldono, Marx-Engels Werke (MEW) de Berlino (GDR), kiun mi tamen disponis nur en ĝia reta versio.[4] Tiu eldono havas la avantaĝon, ke ĝi mencias la variantojn de ĉiuj antaŭaj eldonoj kaj la postajn rimarkojn de Engelso.

Mi konsultis ankaŭ la francan[5], anglan[6] kaj hispanan[7] tradukojn, kaj

– Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco, , MAS, 2011, 113 paĝoj (n-ro 57)

– Ekonomia krizo n-ro 4, MAS, 2011, 52 paĝoj (n-ro 59)

– Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj, … eseoj, MAS, 2011, 35 paĝoj (n-ro 60)

– V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo (kaj aliaj tekstoj de Lenino), MAS, 2011, 40 paĝoj (n-ro 61)

– DKP: Daŭrigo de la Manifesto, Monderna poziciiĝo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP, MAS, 2011, 40 paĝoj (n-ro 62)

– Werner Seppmann: La malkonfesata klaso, MAS, 2011, 176 paĝoj (n-ro 63)

– Roberto Ŝtejgervaldo: Sen laborista klaso … MAS, 2011, 35 paĝoj (n-ro 64)

4 Karl Marx – Friedrich Engels - Werke, vol. 23, p. 11-802, Dietz Verlag, Berlino/GDR, 1962, en: http://www.mlwerke.de/me/default.htm

5 http://www.marxists.org/francais/marx/works/1867/Capital-I/

6 http://www.marxists.org/marx/works/1867/Capital-I
Fonto: Unua angla eldono de 1887 (inkluzive de ŝanĝoj de la 4-a germana eldono kiel indikite);
Eldonisto: Progress, Moskvo, USSR;
Unue publikigita: 1887;
Tradukis Samuel Moore kaj Edward Aveling — editoris Frederick Engels;
Reta versio: Marx/Engels Internet Archive (marxists.org) 1995, 1999;
Transskribis: Zodiac, Hinrich Kuhls, Allan Thurrott, Bill McDorman, Bert Schultz kaj Martha Gimenez (1995-1996);
HTML-formo: Stephen Baird kaj Brian Basgen (1999).

7 Carlos Marx: El Capital. Crítica de la Economía Política. Tomo I. Editorial de

sufiĉe ofte aldonis en mian tradukon teksterojn el iuj el la tri, kiuj ne troviĝas en la germana aŭ kiuj devias de la germana teksto, se mi trovis tiun aldonon sufiĉe interesa – kompreneble ĉiam kun la fontindiko. Kvankam tiuj kompletigoj ofte okazas, ili tute ne estas sistemecaj, kaj pro tio mejlojn for de la historia-kritika eldono (Marx-Engels Gesamt-Ausgabe, MEGA), kiun mi opinias en la nuntempo por Esperantujo ne necesa. Tamen pri tiu ĉi eldono eblas diri, ke ĝi prezentas al la leganto pli kompletan *Kapitalon* ol la ĝisnunaj eldonoj angla, franca aŭ hispana – kaj eĉ germana (kompreneble kun la escepto de la supre nomita MEGA).

Ĉar Markso citas multajn alilingvajn fontojn, ĉefe anglajn kaj plurajn francajn, li tradukas ilin al la germana. Kelkfoje, ekz-e kiam li ne trovis la plej konvinkan germanan ekvivalenton, li aldonis interkrampe la originalan formulon. Kiam mi trovis pli trafan Esperantan ekvivalenton por la fremdlingva formulo ol Markso kredis sian germanan tradukon, mi ne menciis ĉi tie la interkrampan fontlingvan formulon.[8] Tamen en multaj kazoj la anglalingvaj citaĵoj – apud la germana traduko – ŝajnas celi ian emfazan efikon; kie tiu celo ŝajnis al mi evidenta, mi lasis la kroman anglalingvan citaĵon.

En kelkaj okazoj, bedaŭrinde tute ne sistemece, mi aldonis en piednotoj klarigojn pri eble malfacile kompreneblaj vortoj aŭ esprimoj. Proponoj por plibonigi kaj eble etendi tiujn klarigojn estas bonvenaj.

La informojn pri la indekso de personaj nomoj mi ĉerpis el la hispanlingva eldono kaj, se tiuj estis mankhavaj, kelkfoje – sed delonge ne ĉiam – el la enciklopedieto Larousse[9]. La indekso ne havas apartajn fontindikojn; la citaĵoj de Markso aŭ Engelso en la indekso estas rekte prenitaj el la hispana eldono kaj sen fontindikoj kaj sen miaflanka kontrolo laŭ la originalaj tekstoj. Pri iuj personaj nombroj mi trovis nenian informon, nek en la hispanlingva eldono de la Kapitalo nek en por mi konsulteblaj libroj aŭ retejoj, do tiuj nomoj restas sen ajna klarigo. Ankaŭ pri tiuj nomoj eble iuj legantoj scias ion plian kaj povos disponigi ĝin al la legantaro en la

---

Ciencias Sociales, Instituto Cubano del Libro, La Habana, 1973. Tiu ĉi estis la sola hispanlingva eldono, pri kiu mi disponis.

8 Ekzemplo: En la paĝo 236 troviĝas, fine de la citaĵo, la vorto „senigitaj". Markso tradukis el la angla „beraubt werden" („are deprived"), do kun interkrampa aldono de la originala formulo. La Marksa traduko „beraubt werden" signifas en tiu kunteksto laŭlitere „prirabitaj" kaj figurasence „senigitaj". Ĉar „senigitaj" bonege redonas la celatan sencon, mi ne bezonis aldoni la anglalingvan formulon.

9 *El pequeño Larousse ilustrado*, Larousse, 13-a eld., Meksiko, s.j.

diskutlisto <kapitalrondo@yahoogroups.com>.

Ĉar la legantaro de E-aj libroj estas principe tutmondaj, necesas indiki, ĉe naciaj nomformoj, la proksimuman elparolon en Esperanto. Kvankam por germanlingvaj nomoj tiu tasko estas relative facila, por anglalingvaj nomoj ĝi estas preskaŭ nefarebla, se konsideri la tre diversajn elparolojn en la diversaj anglalingvaj landoj. Tamen mi provis doni ankaŭ la indikojn pri anglalingvaj nomoj laŭ miaj memoroj pri la modelo de la „oksforda angla”, per kiu oni traktis min dum pli ol naŭ jaroj en mia juneco. Anglalingvanoj pardonu miajn neprajn erarojn kaj indiku al mi (prefere al la supre menciita diskutlisto) pli precizan aŭ pli oficialan elparolon per E-aj literoj.

Ĝenerale la Esperantigo de propraj nomoj kaŭzas same multajn ĉagrenojn kaj disputojn kiom la principo aperigi ĉiujn nomojn en ilia originala formo. Sed ĉe tiu lasta solvo ni havus por la dana ĉefurbo *København*, kun elparolo, laŭ IFA: [købn̩ˈhaʊˀn]), anstataŭ Kopenhago, kaj nur malmultaj nedanoj scius elparoli ĝin, kaj la latinskribo de ĉinaj, japanaj, rusaj aŭ taĝikaj … nomoj diskriminacius tiujn lingvojn kompare kun la angla, franca, germana, kies vortoj rajtus tiam aperi senĝene en sia originaleco.

Kiel Petro Levi[10] kutimas diri, ne ekzistas ideala solvo por trakti fremdlingvajn nomojn en Esperanto. Konstatante tion, mi sekvas la principon, kiu kiom eble plej kongruas kun la lingvo E-o mem kaj kiu kiom eble malplej diskriminacias aliajn lingvojn.

Se Esperanta formo de propra nomo estas jam uzata en Esperantujo kaj aperas en vortaroj kaj en Vikipedio, tiam mi ne hezitas uzi ĝin. La germana *Einstein* estas la Esperanta Ejnŝtejno. Se propra nomo ne ekzistas tiel en E-o sed aperas ofte en la koncernaj tekstoj, mi E-igas ĝin, tamen indikas la originan formon kun aldona klarigo pri ties elparolo. Se propra nomo ne ekzistas en E-o kaj aperas nur sporade en la koncerna teksto, mi aperigas ĝin en la originala formo (se latinalfabeta) kun indiko de la elparolo. Kaj, se la fremdlingva propra nomo ne estas patronimo, sed ekz-e geografia nomo, loknomo ktp, tiam ĝi aperas kursive.

Konscie, ke tio ne evitas doloron de germano, kiu bedaŭras vidi sian amatan *Marx* (-on) en la formo de Markso, aŭ *Heine* en la formo de Hejno, mi pensas, ke la doloro de germano ne gravas pli ol la doloro de ĉino, kaj ke Esperanto, ankaŭ ĉe propraj nomoj, povas servi kiel

10 la tradukinto de Carlo Cafiero: Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso, [Esperanta traduko, el la franca traduko, de Petro Levi], Eldona Fako Kooperativa de SAT, s.l., 2009, ISBN 978-2-918053-00-2

universala rimedo por respekti nin ĉiujn egalece kaj almenaŭ lingve kiel samideanojn.

Post tiu prilingva ekskurso mi deziras bonan legadon de – kaj en – tiu ĉi libro, kiu estas ja – ankaŭ en siaj historiaj partoj – fascina legaĵo. Kaj ĝis revido eble en la diskutlisto pri la *Kapitalo*:

kapitalrondo@yahoogroups.com

*Vilhelmo Lutermano, Pedro Betancourt, oktobro 2011*

# La **Monda Asembleo Socia (MAS)** …

… estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (*http://eo.mondediplo.com)* – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro *„Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj …" (n-ro 10 en la sekva librolisto)*. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: *http://mas-eo.org* enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

**1. –** ***C. F. Ramuz*****: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

**2. – Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de** ***Hartmut Scheible***, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

**3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

**4. – Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de *Jesús Campos Pacheco* kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

**5. –** ***GBEGLO Koffi:*** **Esperantujismo**, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

**6. – Johano** ***Besada:*** **Eseoj**, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

**7. – [Karlo Markso] Markso hodiaŭ** -- **Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

**8. –** ***Fidel Castro Ruz:*** **Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

**9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949,** elfrancigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

**10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Poitikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

**11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

**12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

**13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko**

**Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

**14. –** ***Eddy Raats:*** **La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

**15. –** ***Dania Rodríguez García*****: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de *Jesús Campos Pacheco* kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

**16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj.** *François Jullien*: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; *Manfred Szameitat*: Sukcesa, sed ne socialisma; *Ingo Nentwig*: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; *Barry Sautman*: Protestoj kaj separismo en Tibeto; *Michael Parenti*: La mito de Tibeto; *Enfu Cheng*: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkat-ekonomio; *Jian Xinhua*: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; *Theodor Bergmann*: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; *Rolf Berthold*: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; *Li Bingyan*: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; *Helmut Peters*: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; *Jean-Louis Rocca*: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

**17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero"; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

**18. –** ***Jörg Goldberg*** **k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1**, *Jörg* Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, *Horst Hensel*: La nomoj de la mono – kontribuaĵo al karakterizo de la nuna kapitalismo, *Harald Werner*: Notoj pri la psiĥologio de la krizo, *Sarah Wagenknecht:* Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

**19. –** ***Salim Lamrani*** **(komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo**, ***Howard Zinn****:* La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, ***Noam Chomsky****:* Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, ***William Blum****:* La nepardonebla revolucio, ***Michael Parenti****:* Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, ***Piero Glejeses****:* Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, ***Ignacio Ramonet****:* Miamo, nesto de teroristoj, ***Salim Lamrani****:* La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, ***Leonard Weinglass*** : La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, ***Wayne Smith****:* Trista paĝo en la historio de usona juro, ***Saul Landau****:* Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, ***Michael S. Smith***: Raporto pri du procesoj, ***James Petras***: La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, ***Jitendra Sharma***: Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, ***Ricardo Alarcón de Quesada****:* La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, ***Gianni Miná****:* Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, ***Nadine Gordimer***: La homaro kiel reflekto de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

**20. –** ***Elisée BYELONGO IŜELOKE:*** **Eĥoj el Bembujo**. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

**21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio;** ***Hansgeorg Conert:*** **Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio;** ***Robert Steigerwald:*** **Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

**22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2**, ***Joachim Bischoff:*** **La financkrizo kaj alternativoj,** ***Andreas Fisahn:*** **Demokratia stirado de la ekonomio,** ***Manfred Sohn:*** **Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo,**

**demokratio,** ***Manfred Lauermann*****: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo**, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

**23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj**. *Lucien Sève:* Ĉu la homo? – La marksa antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, *Werner Seppmann:* Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, *Helga E. Hörz:* Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

**24. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo,** ***Ĉapitroj unua ĝis naŭa***, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7 (elĉerpita, vd n-ro 68 kaj

**25. Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

**26. – Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

**27. –** ***Arnold Petersen:*** **Komentoj al la „Komunista Manifesto"**, tradukis el la angla kaj kompilis *T. Veder*, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

**28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3** (2010), *Werner Seppmann:* Riskokapitalismo;, *Richard Sorg:* Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, *Christina Kaindl:* Subjektiveco en la krizo; *Harald Werner*: La krizo en la ordinara konscio; *Christoph Butterwegge:* Mondekonomiakrizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

**29. –** ***Werner Seppman*****: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso" ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭ-ece; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo?** Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

**30. –** ***Adjévi ADJE:*** **El togolanda saĝosako**, MAS, 2010, ISBN 9782-918300-20-5

**31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo.** Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

**32. –** ***Ivan Efremov*****: La nebulozo de Andromedo**, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

**33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

**34. –** ***Maritza Gutiérrez*****: José Martí – de kie kreskas la palmo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

**35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo,** ***Ĉapitroj deka ĝis dektria***, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

**36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago;** ***Hans-Jörg Schimmel*****: La ideologia dimensio**

**de la $CO_2$-diskuto;** ***Karl Hermann Tjaden*****: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo;** raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN

**37. – Georgo** ***Pleĥanov:*** **Pri rolo de la persono en la historio**, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

**38. – Karlo Markso: Pri la juda demando**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

**39. –** ***Eddy Raats:*** **Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo**, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

**40. –** ***Adebayo AFOLARANMI*****: Ronke, la ĵaluzulino**, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

**41. – Jozefo Ŝlejfŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

**42. –** ***Ivan Efremov:*** **La Horo de Bovo**. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

**43. –** ***Roger Martelli*****: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES**, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6

**44. – Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuaĵo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0

**45. –** ***Miriam Rodrígues*****;** ***ALVERA*****: Desegni la parkon**, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6

**46. – Kien Afriko en la 21-a jarcento?** *Le Monde diplomatique en Esperanto*, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7

**47. – Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0

**48. – Ŝtejgervaldo, Roberto: Komunistaj star- kaj disput-punktoj**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3

**49.** - ***Jürgen Albohn:*** **Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la** ***Wertkritik***. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7

**50. – V. I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio.** Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4

**51. – Unuiĝintaj Nacioj: Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj**. Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1

**52. – Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo**, komp. Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8

**53. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo,** ***Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina*****,** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4

**54. Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn**, tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2

**55.** ***Miriam Rodríguez*****: Profiloj de Suno kaj Luno**, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5

**56. Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300.48-9

**57. Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

**58.** ***José María Arguedas*****: Yawar-festo (Sangofesto)**, Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

**59. Ekonomia krizo n-ro 4.** Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

**60. Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj.** Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

**61. V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo**; Anarĥiismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo"; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

**62. Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciiĝo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP**, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

**63.** ***Lode Van de Velde*****: Epizodoj**, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

**64. Jasuo** ***HORI:*** **Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro**, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

**65.** ***Werner Seppmann:*** **La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

**66. Roberto Ŝtejgervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Luter-mano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

**67.** ***Elmar Getto*****: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo.** Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

**68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5 (Vd la 2-an eldonon, n-ro 113)

**69. Kien la klimato? N-ro 2**, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

**70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5

**71.** ***Ivan Efremov*****: Rakontoj pri neordinaraĵoj**, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

**72. Alfredo *Bauer*: Kritika historio de la judoj, vol. 1**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p, ISBN 978-2-918300-64-9

**73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Gietingter: La miskompreno**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

**74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6

**75. Georgo Fulberto: „La kapitalo" koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4

**76.** ***Ivan Efremov*****: Tais el Ateno.** El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1

**77. Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, en: Vilhelmo Lutermano: Materialo por la seminario de MAS: „Berto Breĥto kaj klasa moralo en liaj verkoj «Historioj pri S-ro Kojno» kaj «Me-ti, libro de turnoj», Parto 2-a: «Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj»", MAS, 2012, 147 p., ISBN 978-2-918300-74-8

**78.** ***Eddy Raats*****: Pasio, defio, amikeco. Spertoj de montgrimpisto.** MAS, 2012, 95 p., ISBN 978-2-918300-70-0

**79.** ***Eddy Raats*****: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo.** 2-a eld., MAS, 2012, 99 p., ISBN 978-2-918300-76-2

**80. V. I.** ***Lenin*****: Imperiismo, kiel la plej alta stadio de kapitalismo.** (populara eseo) El la rusa tradukis Jurij Finkel. Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 125 p., ISBN 978-2-918300-77-9

**81.** ***Yoandry Martínez Rodríguez:*** **Tri en la montaro.** Tri infanteatraĵoj kun desegnaĵoj de Adrián Armas González. Elhispanigita de Jozefo de J. Campos Pacheco, MAS, 2012, 54 p., ISBN 978-2-918300-79-3

**82. Kien la klimato? N-ro 3 (2012) Pri la roloj de kresko kaj de merkato en la tasko protekti la klimaton**, Kvin eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 62 p., ISBN 978-2-918300-80-9

**83. Rolfo Lotero: Ĉu evolucio aŭ kreado?** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 22 paĝoj, ISBN 978-2-918300-81-6

**84. Hans' Magno Encensbergo: Defendo de la lupoj kontraŭ la ŝafidoj. Poemoj**. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 118 p., ISBN 978-2-918300-75-5

**85. Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo.** Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 379 p., ISBN 978-2-918300-82-3

**86. Franco Kafko: Letero al la patro.** Kun akompanaj tekstoj kaj postparolo de Michael Müller. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. MAS, 2012, 81 p., ISBN 978-2-918300-83-0

**87. Aleksandro** ***Grin:*** **Skarlataj veloj. La ora ĉeno. Kuranta sur ondoj. Mallongaj rakontoj.** El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2013, 418 p., ISBN 978-2-918300-84-7

**88.** ***Lothar Peter:*** **Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco?** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 25 p., ISBN 978-2-918300-85-4

**89. Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe. Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la Ontologio de la socia esto; Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio**

**de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 61 p., ISBN 978-2-918300-86-1

**90. Roberto Ŝtejgervaldo: Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-87-8

**91.** ***Heinz Dieterich:*** **Transiroj al la socialismo en la 21-a jarcento**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 22 p., ISBN 978-2-918300-88-5

**92. Frederiko Engelso: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francujo 1848 ĝis 1850 (1895)**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 23 p., 2013, ISBN 978-2-918300-89-2

**93.** ***Máté Zalka:*** **Doberdo. Romano** tradukita el la hungara de *János Petik*, MAS, 2013, 317 p., ISBN 978-2-918300-90-8

**94.** ***Jean-Guy Allard:*** **Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko.** Artikoloj tradukitaj de Norberto *Díaz Guevara* kaj de ceteraj MAS-anoj, MAS, 2013, 445 p., ISBN 978-2-918300-78-6

**95. Bartolomeo Laskaso: Raporto pri la detruado de Indio, kun Hans' Magno Encensbergo: Retrorigardo en la estontecon.** Tradukitaj el la hispana de Ludoviko *Serrano Pérez* kaj el la germana de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 107 p., ISBN 978-2-918300-66-3

**96.** ***V. Adoratskij:*** **Kio estas marksismo kaj leninismo.** El la rusa lingvo tradukis F. Robiĉek, lingve kontrolis E. Drezen. Reeldono de la verko aperinta ĉe EKRELO laŭ vortrekona skano de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 36 p., ISBN 978-2-918300-92-2

**97. Lenino: Pri religio. Du artikoloj. Socialismo kaj religio**, trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk; **Pri rilato de laborista partio al religio**, trad G. Demidjuk; redaktitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-96-0

**98. Instituto Markso-Engelso-Lenino: La instruo de Karlo Markso.** El la rusa lingvo tradukis P. Gavrilov, N. Incertov, V. Polakov, E. Ŝvedova. Lingve kontrolis V. Polakov. EKRELO, Amsterdamo, 1933. Reeldono ĉe MAS laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 39 p., ISBN 978-2-918300-95-3

**99.** ***Ignacio Ramonet:*** **La eksplodo de la ĵurnalismo. De la amaskomunikiloj al la amaso de komunikiloj.** Tradukita de Maria Julia Cárdenas Cápiro kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 104 p., ISBN 978-2-918300-95-3

**100. Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio, kun enkonduko de** ***Eric Hobsbawm***, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 111 p., ISBN 978-2-918300-91-5

**101. Frederiko Engelso: La libro de revelacio (La apokalipso de Johano).** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 28 p., ISBN 978-918300-97-7

**102. Karlo Radeko: Kapitalisma sklaveco kaj socialisma labor-organizo**, EKRELO, Lepsiko, 1931, reeldonita de MAS, laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 43 p., ISBN 987-2-918300-94-6

**103. Frederiko Engelso: Pri la loĝejproblemo.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 80 p., ISBN 978-2-918300-98-4

**104. Aleksandro** ***Grin:*** **La mondo brilanta. La vojo nenien. Cent verstoj laŭ rivero**.

El la rusa tradukis Jurij Finkel. Ilustraĵoj de S. G. Brodskij, MAS, 2014, 434 p., ISBN 978-2-918300-99-1

**105. Historio estas farata. Kontribuaĵoj al la materiisma koncepto de historio. *Georg Fülberth*: La invento de la meztavolo; *Lucas Zeise*: Pri la *homo oeconomicus*, pri la ekonomio kaj pri la laboro; *Hans-Peter Brenner*: La rilato inter homo kaj naturo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. Monda Asembleo Socia (MAS), 201**4, 37 p.,** ISBN 978-2-36960-001-5

**106. *Thomas Metscher*: Lingvo kiel praktika mondkonscio. Rimarkoj pri la marksa kaj engelsa lingvokoncepto kaj pri ĝiaj sekvoj; Roberto Ŝtejgervaldo: Tutsimple marksismo (recenzo); Thomas Metscher: Breĥto kaj la alta arto de simpleco.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2014, 46 p., ISBN 978-2-36960-000-8

**107. Milito kaj paco. Berto Breĥto: La memoro de la homaro; *Andrew Murray*: Milito kaj kontraŭstaro al milito; *Erhard Crome*: Ĉu jarcento pacifika? *Bernd Müller*: Du strategioj de la ekspansio orienten; *Hermann Kopp*: Recenzo de la libro de *Peter Strutynski* pri senpilotaj flugmaŝinoj por batalo (sepavoj); *Thomas Metscher*: „Malbenita estu la milito". Politika poezio – pensadoj pri disputata nocio; 15 jaroj NATO-agreso kontraŭ la Federacia Respubliko Jugoslavio; *Werner Ruf*: La ĝihadisma internacio. Ĉu variaĵo de privata milita entreprenismo?;*Andreas Wehr*: Pri la aktualeco de la imperiismo-demando.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 82 p., ISBN 978-2-36960-002-2

**108. *Thomas Metscher*: Socialisma avangardo kaj realismo. Pri la estetiko de Dmitri Ŝostakoviĉ.** Elgermanigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 40 p., ISBN 978-2-36960-003-9

**109. Berto Breĥto kaj la komunismo. *Manfred Wekwerth*: Breĥto 2006 – kelkaj proponoj; *Werner Seppmann*: Breĥto kaj la perspektivoj de ŝanĝo; *Ernst Schumacher*: Pensado pri Breĥto en la epoko de tutmondiĝinta kapitalismo; *Hans Heinz Holz*: La plumarbo kaj la komunismo. Pri la partieco de breĥta liriko; *Uwe Jens Heuer*: Pri scio kaj kredo; *Jost Hermand*: Breĥto kiel instruisto de «senburĝeco»; *Klaus Höpcke*: «Breĥto sur la tagordon»; *Sabine Kebir*: Berto Breĥto – sendependa komunista intelektulo**. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 116 p., ISBN 978-2-36960-004-6

**110. *Thomas Metscher*: La koncepto de integra marksismo. Teoria koncepto kaj pensado de nova kulturo.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2015, 33 p., ISBN 978-2-36960-005-3

**111. *Claude Piron*: La bona lingvo. Kun antaŭparolo de Renato Corsetti.** ISBN 978-2-36960-006-0

**112. Karlo Markso: La interna milito en Francujo (1871 La Pariza Komunumo). Kun antaŭparolo de Frederiko Engelso.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano. 2-a, reviziita eldono, nur reta, i.a. ĉe http://marxists.org (1-a eldono, paperforma, ĉe *Mondial*, Novjorko, 2005, ISBN 1-59569-025-5) ISBN 978-2-36960-007-7

**113. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2-a eldono, 2015, 763 p., ISBN 978-2-36960-010-7 (en 2015 nur reta, ĉe http://marxists.org) (tiu ĉi libro)

*La libroj akireblas ĉe Esperantaj libroservoj, ĉiukaze ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Elĉerpitaj libroj estas elŝuteblaj ĉe FEL. Por MAS-anoj ĉiuj libroj de MAS estas senpage elŝuteblaj el la retpaĝo de la asembleo-listo de MAS.*

Karlo Markso: La kapitalo

Volumo I

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

2-a eldono (en 2015 nur reta: http://marxists.org)

Monda Asembleo Socia (MAS), 2015

ISBN 978-2-36960-010-7